

PLENA ANALIZA GRAMATIKO


UEA

PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO

K. KALOCSAY G. WARINGHIEN

Kvina korektita eldono

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Rotterdam 1985



Jubilea Kolekto
Jarcento de Esperanto
numero 2

Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, eldonata de Universala Esperanto-Asocio, konsistas el verkoj, kiuj formas kulturajn fundamenton de la Internacia Lingvo.

Inter la aliaj libroj en la Kolekto estas *Esperanta antologio; Poemoj 1887-1981* (numero 1), *Fundamenta krestomatio* (represo), *Nova Esperanta krestomatio*, antologio de Esperanta prozo kaj nova eldono de *Enciklopedio de Esperanto*.

Kovrilo de Franko Luin

DE LA SAMAJ AMBAŬ AŬTOROJ

Kiel fariĝi poeto, aŭ *Parnasa gvidlibro*, Literatura Mondo, 1932; dua eldono, reviziita kaj kompletigita, kun la helpo de R. Bernard. Pola Esperanto-Asocio kaj Heroldo, 1968.

Charles Baudelaire. *La Floroj de l' malbono; Defalajoj kaj Fragmentoj*; kun la helpo de L. Tárkony, H. Vatré, M. Carlsson, R. Bernard kaj H. Dresen. La Laguna: J. Régulo (Stafeto), 1957.

Heinrich Heine. *Kantoj kaj romancoj*. La Laguna: J. Régulo (Stafeto), 1968.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter (ps.). *Libro de Amo*. Biblos (Stafeto), 1969. Pirata fotoreprodukto, 1978.

ELDONHISTORIO

Plena gramatiko de Esperanto; Vorto kaj frazo. Budapeŝto: Literatura Mondo, 1935. 371p.

Plena gramatiko de Esperanto, kun detala komentario pri vorto kaj frazo. Dua tralaborita eldono. Budapeŝto: Literatura Mondo, 1938. 489p.

Plena gramatiko de Esperanto; La vorto kaj la frazo. Tria kompletigita eldono. Milano: Esperanto-Propaganda Centro, 1958, 1964 (nekompleta; aperis nur du el la projektitaj tri volumoj). 362p.

Plena analiza gramatiko de Esperanto. Kvara tralaborita eldono. Rotterdam-Pekino: Universala Esperanto-Asocio, 1980. 599p.

ANTAŬPAROLOJ

AL LA UNUA ELDONO

La unua sento, kiu verŝajne atakos la leganton ĉe la ekrigardo al tiu ĉi libro, estos timo, kaj lia unua penso – amara bedaŭro pri la lilipluta 16-regula gramatiketo de 1887. Li konsoliĝu pensante, ke ankaŭ li mem ne povus survesti sian unuajaran pantaloneton, kaj ke tiu ampleksiĝo de la gramatiko nenion alian signifas krom evoluo kaj kresko de la lingvo. Kaj pri tiu punkto, ni esperas, oni povas nur ĝoji.

Dua senkulpigo: lingvo estas tre vasta kaj kompleksa mekanismo. Estus facile sistemigi ĝin per kelkaj tre ĝeneralaj trajtoj, aperigi ĝiajn ĉefliniojn. Sed se oni vere volas studi ĝin detale, prezenti respondon al ĉiuj etaj demandoj, kiujn ĉe ĉiu fraz-angulo metas la milforma, ĉiamvaria homa penso, estas necese verki iom pli ampleksan libron.

Trie, oni devas memori, ke nian internacian lingvon uzas ne animkonsistaj anĝeloj, sed enkorpiĝintaj homoj: ili ĉiuj havas en sia spirito, profunde gravuritajn, la kutimojn, apartaĵojn, idiotismojn de sia patrina lingvo. Ne estas facile al ili "formeti la malnovan homon kun liaj agoj", fremdigi al sia penso tiel ofte iritajn vojojn kaj vojstrekajn. Oni devas kalkuli kun tiuj naciismoj, kribri ilin, akcepti tiujn, kiuj estas ĝenerale uzataj kaj ne tro pikas la logikon, forpuŝi la aliajn – kaj tiun disjuĝon oni ne povas fari sen granda detalado. Tiel oni povas argumenti, ke en nia gramatiko la malfaciloj venas ne de Esperanto mem, sed de la naciaj lingvoj.

La ĉi-supraj konsideroj povus esti rigardataj, kiel motivoj de sindeteno antaŭ tiel malsimpla tasko. Ni tamen aŭdacis entrepreni ĝin pro la jena kialo. La decida fakto en la historio de Esperanto estis, ke ĝi transvivis sian kreinton. La morto de Z., anstataŭ malfortigi la movadon, ŝajnis streĉi ĉies energion, kaj laŭ la kuraĝa ekzemplo de la Majstro mem, kiu ĝis sia lasta horo tradukadis Andersen kaj la Bibliion, ĉiuflanke multiĝis penadoj por riĉigi nian literaturon per tradukoj kaj originaloj. La amaso de ĉiuj tiuj verkoj estas nun sufiĉe granda, por ke oni sentu la bezonon de ĝenerala trarigardo kaj kontrolo de la lingvouzo, cele al kribrado kaj fiksado. Tia laboro estis jam farita por la leksikologio per la Plena Vortaro, en kies ellaborado partoprenis unu el la aŭtoroj de ĉi tiu libro. Ni provas nun similan laboron super la gramatiko. Ni mallonge indiku nian metodon.

Ni, antaŭ ĉio, studis kaj reduktis al reguloj la uzadon de Zamenhof, kaj de la bonaj klasikaj verkistoj. Estas kompreneble, ke ĉiu gramatiko de-

vas sin apogi unuavice al la zamenhofa lingvuzo. Al tiu principo tamen ni faris du esceptojn:

1. Ne en ĉiuj detaloj la nuna lingvo sekvas la zamenhofan, kaj aliparte ankaŭ mem la zamenhofa lingvuzo ne estas tute unueca: ekzistas provoj, kiujn Z. poste forlasis. Do, se io jam ne estas uzata kaj diversas de la pli ofta kaj logika formo, tion ni ellasis aŭ markis per malaproba noto, eĉ se ĝi estas zamenhofa.

2. En la ĵus menciita materialo, kiel ajn vasta ĝi estas, kelkaj punktoj restis aŭ dubaj, aŭ eĉ tute ignorataj: ni provis ŝtopi ankaŭ tiujn breĉojn. Tiaj lokoj, vere, ne estas multaj en la libro; plejparte ni tenis nin al la principo: "konstati, ne proponi". Kie ni malobeis tiun ĉi principon, tie ni avertis la leganton aŭ per aparta klara formulo ("por tio sin proponas..., oni povus uzi..., estus oportune uzi...", ktp.), aŭ per distinga prestipo: pli malgrandaj literoj aŭ loka apartigo en notojn ĉe la paĝpiedo.

Per tiuj rimedoj ni volis samtempe garantii, ke oni trovu en la libro ĉiujn bezonatajn proponojn, kaj ke ĝi estu tamen fidinde "oficiala".

Ne estos superflue skizi la metodon, kiun ni sekvis por ŝtopi la aluditajn breĉojn. Por tio, ni helpis al ni kaj per la hodiaŭ montriĝantaj tendencoj de la lingvo, kaj per la ĝeneralaj kutimoj de la eŭropaj lingvoj, kaj fine per la abstrakta logiko. Ni klasas tiujn kriteriojn laŭ malkreska ordo de valoro. Efektive, tra nia tuta studado, ni ofte rekonis, ke la pura logiko ne estas la ĉefa potenco en lingvo, ke ofte venkas ĝin formaj aŭ pensaj analogioj, kaj estus rigidigi kaj iel kadukigi la lingvon, se oni submetus ĝin al la ŝtalaj reguloj de la logiko. Tiun instruon ni ricevis de Z. mem; dum sia tuta vivo li obstine kontraŭstaris la raciistajn decidemulojn, kiuj postuladis matematikan regulecon en ĉiuj detaloj de la lingvo kaj aprioran konstruadon de "plena gramatiko": lia rifuzo elverki tian gramatikon venas nur de tio, ke li preferis lasi al la vivo la solvon de multaj problemoj, kiujn la racio per si mem estus eble povinta tranĉi, sed ne malnodi. Se, dank' al la admirinda peno de tiom da verkistoj, ni povis nun entrepreni la taskon, kiun li en 1908 juĝis tro frua, ni tamen intencis ne malobei lian konsilon, kaj kiel eble plej respekti la rajtojn de la vivo, eĉ se devus iom suferi tiuj de la geometria logiko. Tamen, ĉiufoje, kiam en la svarmo da detaloj oni povis distingi la direkton de granda lingva tendenco, ni penis lumigi ĝin, kaj tiel difini la vojon de la evoluo (oni vidu ekzemple la ĉapitrojn pri la pasivo aŭ la refleksivo).

Terminologio kompleta estas nepre necesa por tia verko. En E-o la morfologio havis sufiĉe ellaboritan terminologion, sed la sintakso estis tute neglektata. Ni devis do ŝtopi breĉojn ankaŭ ĉi-rilate. Ni petas la leganton, ke li ne timu nekonatan terminon, se li okaze trovas tian; li elserĉu ĝin el la indekso kaj tiam li vidos, ke tia termino nova alportis por li ankaŭ ideon novan, aŭ de nova flanko prilumitan. En kelkaj okazoj ni faris terminon por akiri koncizon: *prepozitivo*, ekzemple, estas *substantivo antaŭata de prepozicio*.

Fine ni povas deklari, ke ni zorgis pri kiel eble plej senpartia internaci-eco en la difino kaj fiksado de nia gramatika doktrino. La fakto, ke niaj gepatraj lingvoj ne apartenas al la sama lingvistika grupo (unu estas hungara, la alia franca) estis por ni grava helpo kaj donos garantion al la uzanto. Estas ja vere, ke ni dividis inter ni la laboron (Kalocsay faris la *Fonetikon*, la *Vortfaradon*, kaj el la Sintakso la *Kompleksan Frazon*; Waringhien la *Morfologion* kaj *Sinetion* kaj el la Sintakso la *Vort-sintakson* kaj *Propozici-sintakson*), sed la du aŭtoroj estas tiel ligitaj per komuneco de penso kaj de metodo, ke tra la tuta libro plektiĝas la konceptoj de ambaŭ, kaj nur malmultaj pecoj apartenas sole al unu el ili.

Ni ne estus povintaj fari ĉi tiun verkon sen la jam tre vasta laborado de niaj antaŭantoj. Ni deklaras tie ĉi nian grandegan ŝuldon al la esp-istaj vortaristoj kaj gramatikistoj, speciale al

L.L. Zamenhof (Lingvaj Respondoj)

Louis de Beaufront (Commentaire sur la Grammaire Esperanto)

Paul Fruictier (Esperanta Vortfarado kaj Esperanta Sintakso)

Camille Aymonier (Grammaire Complète)

Török Péter (Normala sintakso de E-o)

de Saussure (La logika bazo de la vortfarado en E-o)

Velten (Ausführliche Grammatik des E.)

Walter Lippmann (dr. Zamenhofs Sprachliche Gutachten; Raportoj pri la Sekcio de Gramatiko antaŭ diversaj kongresoj)

E. Wüster (Enciklopedia Vortaro; Internationale Sprachnormung; das Verhältniswort in E.)

Varankin (Teorio de Esperanto)

Göhl (Ausführliche Sprachlehre des E.)

kaj al ĉiuj, kies studoj estis por ni profita helpo; interalie al s-roj *Bastien*, *P. Carreiro-Neto*, *Meguru Takahashi*, *Teo Jung*. Aparte ni volas mencii s-rojn *Grosjean-Maupin* kaj *Butler*, kiuj, la unua en la "Versions" respondaj al la Gramatiko de Aymonier, kaj en la Plena Vortaro; la dua en la "Lingvaj Notoj pri la Malnova Testamento" liveris al ni riĉegan rikolton da zamenhofaj ekzemploj. S-ron Butler ni dankas ankaŭ pro la afabla revizio de la presprovoj. Kaj ĉu inde forgesi Literaturan Mondon, kiu ebligis la eldonon de tiu ĉi verko?

Budapest – Lille, 1935.

AL LA DUA ELDONO

La rapida elĉerpiĝo de la unua eldono pravas, ke la verko plenigis senteban mankon, kaj ke vasta publiko interesiĝas pri tiaj studoj, dezirante alproprigi la lingvon en ĉiuj detaloj. Tiu interesiĝo kvazaŭ devigis nin pliperfektigi la duan eldonon kun konscienca konsiderado de la kritikoj. Se ni malakceptis kelkajn, ni tion faris — oni bonvolu kredi — ne el blinda memestimo, sed el seriozaj motivoj. Ne estos superflue diri pri tio kelkajn vortojn.

Oni riproĉis, eĉ akre, pri nia malfideleco al la Zamenhofa lingvo. Nu, sufiĉas trafolii la libron por konstati la malon: preskaŭ ĉiun regulon ni ilustris per Z-a ekzemplo (*); pri ĉiu duba punkto ni konsultis lian lingvuzon. La ĉefa utilo de la verko estas ĝuste, ke ĝi ebligas tuj informiĝi, kiel Z. solvis iun demandon, dum ĝis nun oni povis tion fari nur post longa relegado de liaj verkoj. Ni tenis nin tiel konsciencite al ĉi tio, ke aliaj nin akuzis pri "Z-a snobismo". Sed ni devis ja konstati la fakton, ke la nuna lingvo en kelkaj punktoj ne sekvas la Z-an uzadon; kaj ni ne povis ne aprobi tiujn *vivantajn* formojn, kiuj al ni ŝajnis pli logikaj kaj oportunaj. Plejparte temas pri malgravaĵoj: neuzo de *kiel* post *ol* (1), kaj de *kvazaŭ* post *ŝajnigi* (2); neuzo de u-modo post *timi* (3) kaj post *ĝis* (4); malpli ofta uzo de *-ad-* (5); perfekta kondicionalo por pasinteco (6); *iu ajn* anst. *kiu ajn*, kiam ne temas pri rilatpronomo (7). La akuzativon post *po* (8), kaj la infinitivon post *sen* (9) oni ne povas diri kontraŭ-Z-aj, ĉar la unuan li diris same bona, kaj la duan li mem uzis kelkfoje. La neuzo de nedifina artikolo (10) baziĝas sur Fundamenta regulo. Ĉi tiu listigo eble moderigos la facilan indignon de kelkaj, precipe se ili konsideras, ke en multe pli multaj punktoj ni klopodas rekonduki al la Z-a modelo.

Oni riproĉis al ni la komplikecon. Nu, ĝi estis neevitebla. Por pritrakti detale vivantan lingvon, oni devas ĝin aranĝi en kadroj, se oni ne volas fali en haoson de neligitaj, splitaj rimarkoj. Krome, ĉar temas pri internacia lingvo, ni devis forgesi ĉiujn naciajn sistemojn kaj konstrui ian absolutan gramatikon bazitan nur sur la racio. Ni devis do fari sisteme la tutan skeleton de la homa lingvo por meti sur ĝin la vivantan karnon de E-o. Sed tio eblis nur ĉe zorgega difinado de ĉiuj vortspecoj kaj funkcioj — kaj tion oni ne povas fari sen taŭga preciza terminaro. Aliflanke, ni devis eliri ne el la lingvoelementoj (tio estas tasko de vortaro), sed el la esprimotaj rilatoj: tiel, ekz-e, ni ne povis pritrakti laŭvice la prepoziciojn, sed ni devis distingi la *okazojn* de ilia uzado, do la adjektojn kaj suplementojn. — Ke tia verko ne estas por komencantoj (kiel multaj emfazis), tio estas evidenta: kiu povas studi E-lingvan gramatikon, tiu

(*) Ni rimarkas, ke niaj Z-aj citaĵoj nur en la ekzemplo-dona parto estas nepre fidelaj; la ceteron ni ofte devis mallongigi, aŭ ŝanĝi por doni al eltirajo memstaran sencon.

ja devas scii jam la lingvon. Sed ke progresintoj povas ĝin konsulti sen kaprompo, tion certigas detala indekso kaj abundaj ekzemploj, kiuj komprenigos la regulon eĉ sen troa atento al ties abstrakta formulado.

Oni riproĉis, ke ni kelkfoje proponis novaĵojn. Nu, eble ni estas pekaj, ke, trovinte ĉe la sistema lingvo-tralaborado kelkajn breĉojn, ni ne povis rezisti la tenton ŝtopi ilin. Sed, unue, ni ĉiam lojale kaj okulfrape evidentigas, ke temas nur pri diskutibla propono, ne pri regulo; due, tiuj proponoj estas nur aldonoj, neniam ŝanĝoj; trie, ni akcentas, ke ni ne rigardas ilin gravaj, neniel volas ilin trudi. Se la lingvuzo akceptos ilin – bone; se ne – tio neniel tuŝos la lingvo-sistemon de ni skizitan. Se ni menciis ankaŭ jam eksmodiĝintajn proponojn, ankaŭ tio ne estas senmotiva: oni ja povas renkonti ilin, kaj tiam estas oportune ekscii, kiel sin tenas la lingvuzo koncerne tiujn formojn.

Oni asertis, ke "kategoriala divido de radikoj tute ne ekzistas". Sed, eĉ se ne konsideri nian demonstradon (§ 282), kial do Z. tradukis en la Universala Vortaro ĉiun radikon per samkategoriala vorto en la 5 lingvoj? Nenio estus pli facila, por nepriigi ilian senkategoriecon, ol traduki ilin substantive en unu lingvo, adjektive en dua, verbe en tria ktp. Aliaj, pli singarde, asertis nur, ke tiu divido jam eksmodiĝis: la lingvo pli kaj pli liberiga de ĝi. Nu, ĝuste la malo estas vera: tio, ke oni pli kaj pli ŝparas pri la sufiksoj (precipe *ec* kaj *ad*), signifas klare, ke oni pli kaj pli fruktuzas la kategoriecon kaŝitan en la nudaj radikoj.

Pluraj opiniis la libron tute senutila; sed ili, ĝentile, nur konjektigis tiun opinion, citante la vortojn de unu el ni, aliloke skribitajn: "... tute ne necesas, ke oni lernu ĉiujn ĉi regulojn... Dio gardu!". Nu, tio estas ja vera: ĉe lingva lerto kaj logikkapablo ĉiu ja povas trovi pli-malpli ĝustan vojon de esprimo. Sed se tio sufiĉas en la ordinara parolo kaj skribo, ja ne en la scienco kaj literaturo: tie oni devas trovi la plej ĝustan, la sole ĝustan, konforman al la t.n. *spirito de la lingvo*. Kiu sin bazas nur sur la Fundamenta Gramatiko, tiu komencas tie, kie la unuaj verkistoj de E-o: por li ne ekzistas tiu lingva trezoro, kiu evoluis per la penoj de tiel multaj aŭtoroj. Tiu trezoro prezentas propre la lingvan "spiriton"; ĝin ni volis kapti en regulojn kaj transdoni en facile konsultibla libro. Oni ofte plendis, ke neseriozaj esp-istoj restas "eternaj komencantoj"; al la seriozaj ni volis doni la rimedon ne fariĝi "eternaj rekomencantoj".

Pli ol tiaj ĝeneralaj kritikoj, estus utilintaj multaj detalaj. Kaj ni petis pri tiaj: ni proponis al S-ro *Rollet de l' Isle*, prezidanto de L.K., ke la libron detale kritiku la Akademio. Estus por ni granda ĝojo, se la dua eldono estus pretiĝinta baze de tiu kritiko. Sed, malgraŭ la komplezaj klopodoj de la afabla Prezidanto, la cirkonstancoj malhelpis, ke la Akademio okupiĝu pri la verko tiel funde, kiel ni esperis. Tamen ni ricevis plurajn valorajn konsilojn kaj rimarkojn, por kiuj ni kore dankas gesinjorojn: *W. Bailey* (abundaj ĝustigoj de Z-aĵoj!), *Leo Belmont*, *M. C. Butler*, *P. Christaller*, *P. Corret*, *H. Dresen*, *E. Drezen*, *E. G. Dodge*, *V. Inglada*, *T. Pumpr*, *A. Stamatiadis* kaj *Lidja Zamenhof*. Ni esprimas

nian ŝuldon ankaŭ al s-ro *Rollet de l' Isle*, el kies verketo pri la mal-simplaj verboformoj ni multe profitis.

Kiel ni diris, la verkon ni submetis al detala revizio. Tamen, veraj ŝanĝoj troviĝas nur pri kelkaj malgravaj punktoj: plejparte temas pri pli detala ellaboro, ekz-e ĉe la adjektoj (*) kaj suplementoj, pri pliuuecigo, pri plikomprenebligo de klarigoj, pliperfektigo de dividoj ks. Per la komuna tralaboro la dua eldono fariĝis eĉ pli komuna verko de ni ambaŭ, ol la unua: ĝi esprimas pri ĉiu punkto nian plene akordiĝintan opinionon.

Ni esperas, ke la dua eldono, kiun ni rigardas definitiva, havos same favoran akcepton kiel la unua. Ni esperas tion en la intereso de la lingva unueco kaj perfekteco, kiujn akceli ni klopodis per nia laborado. Ĉar, por diri nian tutan penson, ni deziras, ke, anstataŭ senfine kaj iom vane diskutadi, oni paceme konsentu pri la solvoj, kiujn ni prezentas (**).

Tiun ŝajne aŭdacan peton ni metas ne senpripense. Se ne konsideri niajn detalajn studojn kaj niajn ofte tre ampleksajn motivadojn, kiuj almenaŭ tiel bone pravigas niajn solvojn, kiel aliaj motivadoj aliajn — restas, kiel decida fakto, ke ĉi tiu verko *ekzistas* kaj estas eĉ la sola, kiu entenas vere detalan esploron de E-o. Se uuecigo de lingvo kaj stilo estas io grava (kiel ĉiuj, cetere, konfesas), ĝi povas efektiviĝi nur sur la bazo de kompleta, al ĉiuj alirebla gramatiko: tian bazon liveras ĉi tiu libro, kaj ne estus la intereso de E-o, se oni facilanime preterpasus la proponiĝintan okazon.

Viena Kongreso, 1936.

AL LA TRIA ELDONO

La dua eldono plu ne estas havebla (granda parto de la ekzempleroj neniigis dum la dua mondmilito), kaj tial estas granda ĝojo por ni, ke, dank' al la entreprenemo de bonvola amiko, doniĝis eblo por la tria eldono de la libro.

En la antaŭparolo al la dua eldono ni skribis, ke tiun eldonon ni rigardas definitiva. Pruvigis tamen, ke tio estis senpripensa: por la tria eldono ni ree tralaboris kelkajn ĉapitrojn, tiun pri *po*, pri la identigaj stataj adjektoj kaj pri la komparaj subpropozicioj; en la ceteraj ĉapitroj ni faris nur malgravajn korektetojn sed multajn etajn aldonojn; ankaŭ la Zamenhofajn ekzemplojn ni ĉie plimultigis.

En tiu tralaborado ni utiligis la rimarkojn kaj esplorojn, kiujn ni havis la okazon fari dum multjara kaj konstanta uzado de la lingvo, kaj ni kom-

(*) Estu al mi permesite diri ĉi tie, ke la admirinde logikan klasifikon de la adjektoj ni ŝuldas al K. Kalocsay. *G. W.*

(**) Ne temas, kompreneble, pri la punktoj, kiuj estas nur personaj proponoj, kaj kies kontesteblo estas evidenta el la teksto (*oni povus uzi... ktp.*).

preneble profitis el la studoj de aliaj gramatikistoj (*).

Pro praktikaj kialoj, la eldonisto decidis presigi jenan eldonon per tri kajeroj, el kiuj la unua entenos la Fonetikon, Morfologion kaj Sintetion; la dua la Sintakson de la Vorto, de la Propozicio kaj de la Frazo; la lasta la Vortfaradon kaj la Indeksojn. Ni devis do aliigi la numerojn de la paragrafoj kaj fari la ŝanĝojn postulitajn de tiu nova aranĝo.

Sed tiuj kompletigoj, ĝustigoj kaj reordigoj lasis ne tuŝita la plenan akordon pri la metodo kaj pri la solvoj, kiun ni atingis malgraŭ la radikala diferenco de niaj gepatraj lingvoj, kaj kiu prezentis eble la ĉefan garantion de la scienca valoro de la "Plena Gramatiko".

Pri unu punkto tamen ni deziras atentigi. Pro diversaj kaŭzoj — prospero de la movado en la nordeŭropaj landoj; malplia kunlaborado de slavlingvanoj, kio senigis nian literaturon je la kontakto kun tiu fekunda kaj iel naskiĝa lingvogrundo; okupo de gravaj postenoj fare de ĝermanlingvanoj — estiĝis ia malekvilibro inter la influoj de la diversaj naciaj lingvoj sur nian Esperanton, kaj ia superpezo de la ĝermana efiko. Nu, unu el la trajtoj, kiuj diferencigas la germanan (kaj nederlandan, danan, ktp.) lingvon disde la aliaj eŭropaj lingvoj, kaj disde Esperanto, estas ĝia fremdeco al la gramatika kategorio de la aspekto, t.e. al la konsidero de la ago koncerne ties daŭron aŭ plenumitecon. El tio rezultis, ke oni en tiuj landoj komence miskomprenis la esperantan uzadon de la participoj, kaj poste elpensis novan participsistemon ĉe la pasivaj verboj, kiu respondus al la aparta "logiko" de la ĝermanlingvanoj, sed tute ne konformas al la "spirito" de nia lingvo. Tiu reformo — ĉar ĝi estas, fakte, reformo — minacas per breĉo en la lingva kontinueco kaj tradicio, ĉar ĝi stampas erara, aŭ almenaŭ eksmoda, la Zamenhofan lingvuzon en *esena* parto de la lingvo. Kaj sekvis aliaj reformproponoj: unuj ribelis kontraŭ la uzado de la *iel*-vortoj por esprimo de la grado, aliaj kontraŭ la uzado de *kiel* ĉe la komparoj, aliaj kontraŭ la subjunkciaj *ĝis* kaj *dum* ktp. Ĉi tiuj herezoj povis des pli senĝene cirkuli, ke ili tuŝas ne la vortojn, sed la sintakson, ne la eksteron, sed la internon, kaj la ekstero estas pli facile rimarkebla por la publiko. Efektive ne estas malfacile eksciti indignon kontraŭ manpleno da neologismoj, dum gravegaj mistraktoj de la modoj, ekz-e, povas korupti la lingvon preskaŭ en kaŝo.

Tamen, kun la tempo, kelkaj esperantistoj ekkonsciis la danĝeron kaj kuraĝe reagis. Tiun reagon intencas apogi la nuna reeldono de nia verko bazita sur la fundamenta tradicio. En nia dua antaŭparolo (pĝ. 10) ni klarigis, kiel ni penis sekvi la Zamenhofan lingvuzon: ni estis, kaj estas,

(*) Ni multe ŝuldas kaj aparte dankas al niaj kolegoj akademianoj *M. C. Butler*, *W. J. Downes*, *F. A. F. Faulhaber*, *W. J. A. Manders* kaj al niaj korespondantoj *F. R. Banham*, *E. A. Haugen*, *R. Rossetti* pro iliaj utilaj kaj saĝaj konsiloj aŭ rimarkigoj; al *Dro T. Pumpr* pro liaj artikoloj rilataj al la po-problemo; al s-ro *Kenji Ossaka* pro la serio de liaj instruoplenaj studoj en "La Revuo Orienta"; kaj fine al s-ro *H. A. de Hoog* pro lia bonega libro "Du Malsanoj en Esperanto".

efektive, profunde konvinkitaj, ke nur sur tiu tereno, firma kaj klare difinita, ĉiuj esperantistoj povos, kun iom da toleremo, retrovi sian lingvan unuecon. Ni tie supre listigis 10 punktojn, ĉe kiuj la moderna uzado ŝajnas disiĝi de la Zamenhofa. Se oni rigardos tiujn punktojn, oni rekonos, ke temas pri malgravaĵoj, kaj parte pri tiaj aferoj, kiujn Zamenhof lasis ne plene deciditaj, parte pri ŝanĝetoj, kiuj estiĝis kvazaŭ per si mem dum jardekoj da literatura laborado. Sed se oni prenas tiujn ŝanĝetojn kiel pretekston por la renverso de la Zamenhofa verbsistemo, prefere ni revenu, eĉ en tiuj punktoj, al la Zamenhofaj kutimoj kaj formoj. Tamen ni kredas, ke la esperantistaro povos bone distingi inter malgrava spontana poluriĝo de la lingvosurfaco, kaj la arbitra, apriora logikumo baze de miskompreno, per kiu anoj de unu lingvogrupo volas trudi formojn kontraŭajn al la lingvosento de alilingvanoj kaj al nia tuta lingva tradicio.

Tial, renovigante ĉi tie nian seriozan kaj insistan alvokon al ĉiuj bon-intencaj kaj devokonsciaj esperantistoj, ke ili konsentu pri la solvoj prezentitaj en nia verko, ni pure kaj simple petegas ilin reveni al la Zamenhofa tradicio, sola bazo de tiu unueco, kiu estas por nia movado la kondiĉo de la venko.

Budapest – Choisy-le-Roi, 1957.

La Aŭtoroj

AL LA KVARA ELDONO

Tiu ĉi antaŭparolo estas subskribita, ho ve, de unu sola nomo: la mal-apero de mia verkofrato sentigas al mi, pli ol iam, kiom mi ŝuldis al lia genio kaj kiom pezas sur miaj ŝultroj la restanta tasko.

Dudek jaroj forpasis, de kiam ni kune redaktis la trian eldonon, kaj eĉ tiu restis nekompleta: la subita morto de nia amiko Stefano La Colla, kiu iniciatis tiun reeldonon, faris, ke la tria parto, pri la vortfarado, kvankam kompostita, ne povis aperi libroforme. La unuaj du kajeroj cetere rapide elvendiĝis, kaj la verko jam de longe ne plu estas akirebla. Granda estas la merito de la Estraro de U. E. A., ke ĝi entreprenis, en la nunaj malfacilaj cirkonstancoj, la publikigadon de jena kvara eldono.

Dum tiuj dudek jaroj okazis revolucio en la lingvistiko, mi diru pli ĝuste revolucioj, ĉar, se la fundamenta ambicio de ĉiuj skoloj estas fari el ĝi rigore ekzaktan sciencon, esprimeblan per algebraĵoj, diversaj sistemoj ne ĉesis sekvi kaj kritiki unu la alian, la *strukturismo* de Trubetzkoy, la *glosematiko* de Hjelmslev, la *distribucionalismo* de Fries, la *generativismo* de Chomsky ktp. Kaj la nomenklaturetoj, postulataj por "diskrete" elnombri ĉiun fenomenon, fariĝis ne nur pli detalegaj (mi citu nur la svarmantan tribon de la em-nomoj: *pleremo*, *alosemo*, *kategoremo*, *grafemo*, *prosodemo*, *asilabemo* ktp., ktp.), sed ankaŭ pli kaj pli diverĝaj laŭ la aŭtoroj (kio estas *morfemo* ĉe Jakobson estas

monemo ĉe Martinet ktp.), tiel ke Benveniste povis skribi jam en 1954, ke "iaj diskutoj estas kompreneblaj por la adeptoj de unu metodo, nur se ili estas transponitaj en ties propran nomenklaturon." Estas certe tute normale, ke lingvistoj provu apliki sian metodon al nia lingvo (kvankam mi persone havas la intiman konvinkon, ke estas neeble redukti al aŭtomataj transponformuloj la senliman kreivecon de la homa spirito, same kiel procedaroj, eĉ elektronaj, neniam elĉerpos la fekundecon de la homa arto). Sed la legantoj, kiuj havis la paciencon legi niajn unuajn tri antaŭparolojn, jam konstatis, ke la celo de nia verko neniam estis la starigo de ia ajn teorio, kaj ke nia tuta ambicio estis meti en la manojn de la Esperanto-parolantoj oportunan rimedon malkovri, kia estas la tradicia, klasika uzado pri ĉiuj punktoj de nia lingvo (*), kaj per kiaj tendencoj efektive esprimiĝas tiu "spirito de la lingvo", aludita de Zamenhof en lia letero al Borovko, kaj difinita kiel modelo de stilo en la "Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo". La kunekzistado (ne ĉiam paca!) de pluraj lingvistikaj sistemoj unuflanke, kaj, aliflanke, la zorgo pri la utiligebleco de nia verko por ĉia publiko, klarigas, kial ni decidis konservi nian prezentmanieron kaj terminologion, kiun ni cetere rafinis laŭ la postuloj de la analizo, distingante ekzemple la subjunkciojn disde la konjunkcioj, la prediktajn tempojn apud la preteritaj, kaj, kelke tridek jarojn antaŭ Chomsky, sintakson de la vortokerno aparte de la sintakso pri la propozicio kaj pri la frazo.

Dum tiu sama tempospaco multaj estis la konsiderindaj esploroj pri la gramatiko de nia lingvo; interalie la demando pri la uzado de la pasivaj participoj estis studita en la "Simpozio pri ata/ita" (Stafeto, 1961), kaj la tuta demando pri la uzado de la tempoj en la "Vojaĝo inter la tempoj" de K. Kalocsay (Stafeto, 1966), dum R. Schwartz briligis sian klarecon de "ne-lingvismo" en la broŝuro "Ne kiel Meier!" (Franca Esperanto-Instituto, 1967) kaj en eseo "Kompleta Inventaro de la pasivaj participoj en la verko *La Rabistoj*" (Aktoj de la Akademio II, 1974): el ĉio tio mi penis eltiri la esencon, kaj enkorpiĝi ĝin en la koncernajn ĉapitrojn.

Male, pri aliaj problemoj, pri kiuj mi ne havis la okazon aŭ la eblon diskuti kun Kalocsay, mi restis tre singarda, ne volante meti sub lian nomon opiniojn, kiujn li estus povinta ne partopreni. En la malmultaj lokoj, en kiuj mi trovis utila esprimi mian propran vidpunkton, mi ĉiam aldonis en la fino miajn inicialojn: G. W.

Jen do la lasta formo de tiu verko de intima kunlaborado, komencita en 1934 laŭ la instigo de Vilmos Bleier, nia neforgesinda eldonisto; en ĝin ni metis la resumon de niaj konstantaj esploroj pri la lingvo de Zamenhof, Grabowski, Kabe kaj aliaj plej famaj aŭtoroj, kaj la plej bonan el nia sperto de tradukistoj. Je ĉiu reeldono ĝi vekis kritikojn, ofte pasiajn, sed entute ĝi estis ŝatata kaj uzata de la plimulto. Mi

(*) Tion ni volis akcenti per la enmeto de "analiza" en la antaŭan titolon.

rajtas diri, ke, malgraŭ la neeviteblaj mankoj, ĝi efike kontribuis, kaj – mi esperas – kontribuos plu, same kiel la "Plena Ilustrita Vortaro" sur alia tereno, al la stabiligo kaj unuecigo de nia lingvo, nenion deprenante de ĝia fleksebleco. Kian pli altan celon povis proponi al si la du aŭtoroj, kaj kian pli prudentan deziron ili povus esprimi je ĉi tiu adiaŭa momento, ol ke tiun saman celon neniam forgesu tiuj, kiuj pli aŭ malpli baldaŭ venos ilin anstataŭi?

Vitry-sur-Seine, 1977.

G. Waringhien

P.S. Mi dankas la korespondantojn, kiuj bonvolis komuniki al mi siajn rimarkigojn; du almenaŭ mi volas nomi, pro ilia detala esplorado de la P.G., s-rojn F. Couwenberg kaj L. Lentaigne.

P.S.2a. La legantoj, kiuj bedaŭros nian decidon ne adopti, en ĉi tiu esence pedagogia verko, la metodojn de la novaj lingvistoj, konsolu sin per jena konfeso de la plej eminenta el ili: "Sincere, mi estas sufiĉe skeptika pri la valoro, por la lingvo-instruado, de tiaj subtilecoj kaj sagaco, kiajn oni akiris en lingvistiko kaj psikologio." (Noam Chomsky, "Linguistic Theory", en "Northeast Conference on Research and Language Learning", 1966).

LA FUNDAMENTA
GRAMATIKO

La titolon "Plena Gramatiko de Esperanto" portas, en la "Fundamenta Krestomatio", la dek ses reguloj, kiuj, en la "Fundamento", estas titolitaj simple "Gramatiko". La epiteton "plena" Zamenhof evidente uzis nur el propagandaj kaŭzoj. Li mem konsciis ja pri la nesufiĉeco de tiu gramatiketo kaj tial li ĝin kompletigis jam en la "Fundamenta Ekzercaro", parte en formo de ekzemploj, parte en formulitaj reguloj; kaj poste li daŭrigis la kompletigon en siaj "Lingvaj Respondoj". Voli limigi la fundamentecon al tiu gramatiketo kaj apogi sin ekskluzive sur ĝi por pritrakti la ĉefajn demandojn de nia lingvo estus do ne scienca kaj iel infana sinteno. Tial tiun gramatiketon ni presigas, kape de nia libro, pli kiel historian dokumenton, ol kiel la ununuran fonton de niaj informoj pri la lingvo.

Ni citas la regulojn sensaĝe, escepte ilian vic-ordon: ni vicigis la paragrafojn laŭ la ordo de nia pritraktado. La originan numeron ni donas parenteze.

A. Alfabeto

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz.

Rimarko. Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u.

B. Reguloj

1 (15). La tiel nomataj vortoj *fremdaj*, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

2 (9). Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita.

3 (10). La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

4 (2). La *substantivoj* havas la finiĝon *o*. Por la formado de la multenombro oni aldonas la finiĝon *j*. Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo *n*. La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per *de*, la dativo per *al*, la ablativo per *per* aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco).

5 (16). La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata per apostrofo.

6 (5). *Pronomoj* personaj: *mi, vi, li, ŝi, ĝi* (pri objekto aŭ besto), *si, ni, vi, ili, oni*; la pronomoj posedaj estas formataj per la aldono de la finiĝo adjektiva. La deklinacio estas kiel ĉe la substantivoj.

7 (3). La *adjektivo* finiĝas per *a*. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe la substantivo. La komparativo estas farata per la vorto *pli*, la superlativo per *plej*; ĉe la komparativo oni uzas la konjunkcion *ol*.

8 (1). *Artikolo* nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (*la*), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj.

Rim. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi.

9 (4). La *numeraloj* fundamentaj (ne estas deklinaciataj) estas: *unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil*. La dekoj kaj centoj

estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por la signado de numeraloj ordaj oni aldonas la finiĝon de la adjektivo; por la multoblaj – la sufikson *obl*, por la nombronaj – *on*, por la kolektaj – *op*, por la disdividaj – la vorton *po*. Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbiaj.

10 (7). La *adverboj* finiĝas per *e*; gradoj de komparado kiel *ĉe* la adjektivoj.

11 (12). *Ĉe* alia nea vorto la vorto *ne* estas forlasata.

12 (6). La *verbo* ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj. Formoj de la verbo: la tempo estanta akceptas la finiĝon *-as*; la tempo estinta *-is*; la tempo estonta *-os*; la modo kondiĉa *-us*; la modo ordona *-u*; la modo sendifina *-i*. Participoj (kun senco adjektiva aŭ adverba): aktiva estanta *-ant*; aktiva estinta *-int*; aktiva estonta *-ont*; pasiva estanta *-at*; pasiva estinta *-it*; pasiva estonta *-ot*. Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo *esti* kaj participo pasiva de la bezonata verbo; la prepozicio *ĉe* la pasivo estas *de*.

13 (8). Ĉiuj *prepozicioj* postulas la nominativon.

14 (13). Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo.

15 (14). Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon, sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion *je*, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio *je* oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.

16 (11). Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

LA VORTO

La vorton oni devas esplori el tri vidpunktoj.

1. La unua okupiĝas pri la grafika prezentado de la vortoj aŭ de la rilatoj inter tiuj vortoj. Tiun parton de la gramatiko ni pritraktos en la ĉapitroj **Ortografio** kaj **Interpunkcio**.

2. La dua okupiĝas pri la sona konsisto de la vortoj, pri la sonoj kaj bruoj, el kies alterna sinsekvo estiĝas la homa parolo. Tiun parton ni pritraktos en la ĉapitro **Fonetiko**.

3. El la tria oni pritraktas la diversajn formojn, kiujn la konstruita vorto alprenas por esprimi *rilatojn*, do kiujn la vorto ricevas kvazaŭ de ekstere dum la uzado (ekz-e por esprimi la pluralon, la preteriton ktp.). Tio estas propre la **Morfologio**.

La reguloj, laŭ kiuj oni uzas tiujn diversajn formojn, apartenas al la kampo de la sintakso; sed kiam la elekton inter la diversaj formoj diktas ne la konstruo de la frazo, sed la esprimata ideo, (ekz-e ĉu uzi *ĝia* aŭ *ties*, *duope* aŭ *po du* ktp.), ni trovas nin sur aparta kampo, kiu ĝis nun ne ricevis nomon ĉe la gramatikistoj. Ni difinis ĝin per la nomo **Sinetio**. Pro praktikaj konsideroj ni kunigis ambaŭ en la ĉapitro **Morfologio kaj Sinetio**.

**I. ORTOGRAFIO
KAJ INTERPUNKCIO**

LA ORTOGRAFIO

La alfabeto

La lingvo Esperanto estas skribata per 28 literoj, kies listo konsistigas la **alfabeton**. Ĉiu el tiuj literoj povas havi du formojn, unu grandan (majusklan) kaj unu malgrandan (minusklan). **1**

Majuskloj: A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ K L M N O P R S Ŝ T U Ŭ V Z.

Minuskloj: a b c ĉ d e f g ĝ h ĥ i j ĵ k l m n o p r s ŝ t u ŭ v z.

Rim. La litero ŭ troviĝas preskaŭ nur post alia litero (a aŭ e): sed nenio en la lingvo malhelpas uzi ĝin ankaŭ ĉe la komenco de vorto, sekve ankaŭ eventuale sub la majuskla formo ĉe la geografiaj nomoj, kiel faras la japanoj (ekz-e *Ŭej-ho* ktp.).

La unua paragrafo de la "Fundamenta Ekzercaro" donas la nomon de tiuj literoj: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo. **2**

Tio estas la nomoj uzataj en la ordinara literumado (ekz-e ktp: *kotopo*). Tamen, en la scienca praktiko, tiuj nomoj montriĝis ne oportunaj, ĉar la tro sonora vokalo *o* kaj la tro regula formiĝo de ĉiuj tiuj nomoj malfaciligas la distingon inter ili (kp *mo* kaj *no*, *ĵo* kaj *ŝo*; aŭ la plej simplajn kemiajn formulojn COOH...). Aliaj sistemoj estis do proponitaj por la fakaj lingvoj, kaj ili povas esti reduktitaj al jenaj du tipoj:

a) la unua celas resti en la limoj de la Fundamento: ĝi utiligas simple la eblon uzi substantive la finaĵon *-a* (kp § 74), por krei variaĵon inter la tro najbaraj sonoj. Oni ricevas ekz-e la serion:

a, ba, co, ĉo, da, e, fo, ga, ĝa, ha, ĥo, i, jo, ĵa, ko, lo, mo, na, o, po, ra, so, ŝo, to, u, ŭo, va, za.

En okazo de pluformado, estus oportune konservi la vokalan finaĵon, kaj diri ekz-e "*levi nombron je la naa potenco*" ktp. Tiun solvon Waringhien proponis en "Esperanto" (Jan. 1951), kaj ĝin uzadis, sen ia ĝeno, inter aliaj, D-ro Sirk en siaj prelegoj ĉe la diversaj Someraj Universitatoj.

b) la dua celas atingi la plej grandan internaciecon. La plej bona sistemo estis proponita de D-ro Belinfante en la "Scienca Revuo" (Jul. 1951): a, be, ce, de, e, ef, ge, haĉ, i, jot, ka, el, em, en, o, pe, er, es, te, u, vi, ŭe, zet; por la supersignitaj literoj, li proponis diversajn nomojn, interalie: ĉe, ĝo, ĥa, ĵe, ŝa, ŭo.

Kiel ofte okazas ĉe tiaj demandoj, neniu el la du sistemoj estas plene kontentiga: la unua havas kontraŭ si sian arbitrecon, la dua male ne atingas klaran distingon inter la najbaraj sonoj (*em* kaj *en*, *de* kaj *te* ktp). La problemo restas solvota.

Menciinda estas ankaŭ la sistemo, kondensita de Kalocsay en jenaj versoj:

a, be, ce, de, e, ef, ge, ha,
i, je, ka, el, om, en, o, pa,
er, es, ta, u, ve, ĉa, ĝe,
fi kaj ĵi, eŝ, ŭo kaj ze,
plus ku, ikso, ipsilono,
jen la abece-kolono.

Ĝi malmulte diverĝas de la internacia kutimo kaj tamen eliminis la miskomprenojn ĉe la similtaj konsonantoj.

- 3** Kompare kun la norma latina alfabeto, la esperanta diferencas per du trajtoj: la ĉefa estas, ke ĝi prezentas la gingivajn sonojn ne per kunigo de simplaj literoj (digramoj, kiel la F. *ch*, la A. *sh*; trigramoj, kiel la G. *sch* aŭ la I. *sci* ktp.), sed per modifita formo de la kvin konsonantoj, de kiuj la gingivaj sonoj historie devenas: oni supermetas al ili cirkumflekson, kaj pro la formo de tiu signo, oni iafoje nomas ilin "ĉapelitaj" literoj (ĉ, ĝ, ĵ, ŝ); tiu sama supersigno estas uzata por distingi la frikativan velaron (h) disde la laringala (h). Male, por averti, ke u fariĝas en kelkaj okazoj dua elemento de diftongo, oni supermetas al ĝi renversitan duoncirklon (ŭ).

Tiu sistemo de sonprezentado estis inspirita de la ĉeĥa alfabeto (en kiu cetere la cirkumfleko estas returnita). Ĝi estas simpla kaj oportuna. Tamen en la komencaj jaroj, ĝi estis serioza ĝeno por la propagando, ĉar ĝi postulas specialajn lertipojn. Tial Zamenhof donis, jam en la "Unua Libro", kaj oficialigis en la "Fundamento" la permeson anstataŭigi la supersignitajn literojn per la digramoj *ch*, *gh*, *hh*, *jh*, *sh*, kaj tute forlasi la supersignon de ŭ. Kvankam tio estis ia sistemigo de la ĥaosaj naciaj digramoj aŭ trigramoj, la esperantistoj instinkte sentis, ke tiu farmaniero prezentas fonetikan malprogreson. Zamenhof mem uzis ĝin nur en telegramoj; kaj, malgraŭ la provo de franco, E. Gasse, kiu presigis per tiu metodo sian tradukon de la "Vivo de Jesuo" de E. Renan (1907), ĝi restis praktike ne aplikata. Eĉ en la okazoj, kiam oni devas presigi esperantajn komunikojn per neesperanta gazeto, la plej multaj preferas tute forlasi la supersignojn, kio alkondukas al nedefendeblo kripligo de la lingvo.

Ĝuste por tiu lasta okazo ekzistas unu, eble ne tre logika, sed oportuna elturniĝo. Konsiderante, ke tre multaj okcidentlandaj presejoj havas la rimedojn presigi la cirkumfleksajn vokalojn de la franca lingvo (ekz-e en la vortoj: *pâté*, *fête*, *maitre d'hôtel*, *croûton* – kiuj cetere estas uzataj ankaŭ tiuforme en la angla lingvo), St. La Colla proponis, ke oni kvazaŭ deŝovu la supersignon de sur la konsonanto sur la tuj postan vokalon, kaj akceptu la konvencion, ke, en tiaj okazoj, supersignita vokalo donus gingivalan sonon al la ĵus antaŭa konsonanto. Tiu artifiko iel konservas la fizionomiojn de la esperantaj vortoj, kiel oni vidas el jena ekzemplo: "*Cé la sângôj okazintaj en la cf-landa vojkodo, ĉiuj automobilistoj zorge informigû pri la ĵûsaj legâj instrukcioj*".

- 4** La dua diferenco inter la latina kaj la esperanta alfabeto estas la malapero de kvar superflujaj literoj: *q*, *w*, *x* kaj *y*. Ĉar tiuj literoj estas tamen

uzataj kiel simboloj en matematiko ktp., oni utiligas ilin kun tia valoro ankaŭ en Esperanto ("formoj de tiu aŭ alia lingvo al Sinjoro X. aŭ Y. estas konataj"²) kaj oni tiam nomas ilin respektive: *kuo*, *duobla vo*, *ikso*, *i greka* aŭ *ipsilono*. D-ro Belinfante proponis por ili la nomojn, pli mallongajn: *ku*, *ŭe*, *is*, *ŭaj*. Sed, kiel literoj, ili estas regule transskribataj per la esperantaj respondaj literoj, nome: *q* per *k*, *w* per *v*, *x* per *ks* kaj *y* per *i*. Krome la latina duonvokalo *u*, kiam ĝi senpere sekvas konsonanton, estas, laŭ la rusa kaj germana prononcado, transskribata per *v*: *gu* fariĝas *gv*, *qu* fariĝas *kv*, *su* fariĝas *sv* (Kp *lingua* kaj *lingvo*, *quercus* kaj *kverko*, *persuadere* kaj *persvadi*).

Rim. La regula transskribo de *x* per *ks* estas modifata en la komenca silabo *ex*, kiam tiun sekvas vokalo: por eviti konfuzon kun la esperanta prefikso *eks*, oni tiam uzas la transskribon *kz* (kp. *examen* kaj *ekzameno*). Oni scias, ke la Universala Vortaro prezentas du ekzemplojn de tiu transskribo interne de vorto: *makzel* kaj *okzal*, probable por eviti eventualan konfuzon kun la radikoj *sel* kaj *sal*.

La grekaj literoj, uzataj kiel matematikaj simboloj, estas nomataj: alfa, beta, gama, delta, epsila, dzeta, eta, teta, jota, kapa, lambda, mu, nu, ksi, omikra, pi, ro, sigma, taŭ, upsila, fi, hi, psi, omega (*psila*, *mikra* kaj *mega* estas propre adjektivoj, kun signifo: maldika, malgranda kaj granda).

La transskribo de tiuj literoj en Esperanton estas la sama, kiel en la latina lingvo, krom pri la elspiraj literoj: al la latina *th* respondas simpla *t* (*theatron*: *teatro*), al *rh* simpla *r* (*rhetor*: *retoro*), al *ph* simpla *f* (*phosphoros*: *fosforo*); al *ch* respondas jen *ĥ*, jen, pli ofte, *k* (*psyche*: *psiko*); pri *x* vidu § 4.

Aparta karaktero de la esperanta ortografio estas, ke ĝi sisteme unuobligas la duoblajn konsonantojn: al L. *flamma* respondas E. *flamo*, al F. *gramme* respondas E. *gramo*, al G. *Rippe* respondas E. *ripo* ktp. Tiu simpligo havas du avantaĝojn: unue ĝi faciligas la memorigon de la vortformo, dum, en la franca aŭ la angla, oni ofte dubas, ĉu skribi per unu aŭ du konsonantoj vorton, kiun oni cetere prononcas nur per unu; due, ĝi faciligas la rekonon de kelkaj kunmetitaj vortoj, ĉar inter la du samaj konsonantoj kuŝas la limo de la du elementoj: *huffero* analiziĝas unuavide en *huf-fero*.

Estas tamen unu okazo, en kiu tiu kutimo kaŭzas ĝenon: tio estas ĉe la transskribo de la propraj nomoj kun unusilaba radikoj. La personaj nomoj *Ana*, *Ema*, *Fino*, *Galo*, *Grako*, *Piro*, *Rolo*, *Sulo*, *Taso*, la geografiaj *Basa Markolo*, *Bono*, *Kano*, *Laso*, *Meko* ktp. prezentas malfacile rekoneblan aspekton, parte pro ilia sameco kun komunlingvaj radikoj. Ĉar la unuobligo de la duoblaj konsonantoj estas nenie formulita kiel regulo, kaj ĉar la rusa lingvo, de kiu ĝi estas pruntita, konas ankaŭ esceptojn ĉe tiaj propraj nomoj, ŝajnas oportuna konservi ĉe ili la duoblajn konsonantojn, kaj skribi (kiel jam faris Zamenhof por pluraj el ili): *Anna*, *Emma*, *Finno* ktp., *Bassa Markolo*, *Bonno*, *Kanno*, *Lasso* ktp.

5

6

LA INTERPUNKCIO

- 7 La interpunkcio, per la uzo de diversaj signoj, servas por dividi elementojn aŭ partojn de la frazo kaj por plifaciligi per tio la travigardon de la frazkonstruo kaj la komprenon de la teksto.

Z. en "La Esperantisto" (N-ro 44, p. 127) diris la demandon de la interpunkciado negrava kaj lasis plenan liberon al ĉiu, uzi la interpunkciojn same kiel en sia gepatra lingvo. Li diris, ke por la starigo de striktaj reguloj "ne venis ankoraŭ la tempo". Sed samtempe li esprimis la opinion, ke la uzado enkondukos iom post iom difinitajn regulojn.

Ankaŭ la interpunkciado de Zamenhof ne estas tute unueca. Tamen, oni povas konstati en liaj verkoj kaj en la verkoj de bonaj E-aj aŭtoroj certajn tendencojn, baze de kiuj nun jam oni povas fiksi la E-an interpunkciadon, se ne en ĉiuj detaloj, almenaŭ en ĝiaj ĉefaj trajtoj.

La interpunkciaj signoj estas: punkto (.), komo (,), punktokomo (;), dupunkto (:), krisigno (!), demandosigno (?), tripunkto (...), haltostreko (—), dividstreko (-), citiloj (" "), krampoj ([]), steleto aŭ asterisko (*), apostrofo (').

Punkto

- 8 *Punkton* oni uzas ĉe la fino de frazo: *Pluvas.; mi ne povas eliri, ĉar mi ne havas pluvombrelon.*

Oni uzas ĝin ankaŭ post mallongigoj: *t.e.* (tio estas); *vd.* (vidu); *k.t.p.* aŭ *ktp.* (kaj tiel plu); *ekz.* (ekzemple). Tamen, oni ne uzas tiaokaze punkton:

a) se la lasta litero estas konservita: *E-o* aŭ *Esp-o* (Esperanto); *N-ro* (numero); *D-ro* (doktoro); *S-ro* (sinjoro); *S-ano* (samideano); *k-do* (kamarado).

b) se la mallongigon oni uzas ankaŭ parole: UEA, ICK, KKK, LKK, IEL.

Rim. I. Pluraj uzas la mallongigon *k* (kaj) sen punkto.

Rim. II. En la matematiko, la anglosaksoj uzas la punkton por apartigi la unuojn disde la decimaloj, dum la eŭropanoj uzas por tio komon. Ĉi lasta signadmaniero ŝajnas preferinda. Sed, ĉar en la formuloj la punkto estas uzata kiel simbolo de multipliko, estus preferinde uzi simple blankan spacon por dividi longan nombron en grupojn de 3 aŭ 6 ciferoj, ekz-e: 125 250 416, 75 = cent dudek kvin milionoj ducent kvindek mil kvarcent dekse kaj sepdek kvin centonoj.

Komo

Komon oni uzas:

- 9 1. post vortoj de alparolo: *Dio, helpu min!* Intermetitan alparolon oni metas inter du komojn: *venu, kara, tien ĉi.*

Rim. I. Oni ne uzas ĝin post *ho* kaj *he*, se tiujn sekvas vokativo aŭ alia interjekcio: *ho Dio! he vi! ho ve!*

2. antaŭ kaj post apozicio: *Parizo, la urbo de la lumo, estis malluma*

ĉi-nokte; antaŭ ekvivalentiĝinta nomesperimo: *lian kvaran filon, Petron*. Mankas la komo antaŭ vera nomesperimo: *la lingvo Esperanto* kaj antaŭ implicita citaĵo: *la nomo Karlo*.

3. por apartigi samspecajn frazelementojn ne ligitajn per konjunkcio: *Petro, Paŭlo kaj Karlo estas amikoj; mi aĉetis plumon, paperon kaj inkon; ŝi estas juna, bela, afabla; parolu forte, kuraĝe kaj elegante*.

Rim. II. Epitetojn oni apartigas per komo, se ili rilatas ĉiuj senpere al la sama substantivo: *juna, bela, afabla virino*. Sed oni ne metas komon, se la unua epiteto rilatas kune al la dua kaj al la substantivo, kiuj lastaj do faras unu komunan komplekson: *granda latina poeto; kia terura afero!; belega verda kampo*.

Rim. III. Oni ne metas komon inter samspecaj frazelementoj ligitaj per konjunkcioj kaj, nek, aŭ, sed: *nek vi nek mi; dekstren aŭ maldekstren; homo malforta sed sana*.

4. post antaŭmetitaj particip-adverboj: *trovinte pomon, mi ĝin manĝis*². Ofte ankaŭ post neparticipaj adjektoj antaŭmetitaj, precipe longaj: *post multaj klopodoj, li fine sukcesis realigi siajn planojn*. Post adverboj, kies rilato al la predikato estas malstrikta: *fakte, tio estas malebla; kompreneble, mi ne povas kontraŭdiri; tio estas, kompreneble, nur ŝerco*.

5. post adjektaj predikativoj antaŭmetitaj: *plenplena de homoj, la salono havis sufokan aeron*.

6. ofte antaŭ postmetitaj particip-adjektivoj, kiam ili havas plurajn komplementojn; se ili estas intermetitaj, oni metas ilin inter du komojn: *la kastelon, forbruligitan de la turkoj en la jaro 1534, oni rekonstruis en 1688*.

Rim. IV. Oni ne metas komon antaŭ infinitivaj objektoj aŭ adjektoj: *mi helpas vin fari la laboron; mi ne vidas eblon ripari la eraron; mi venis por vin averti; li babilis anstataŭ labori*. Tamen, en tiaj konstruoj, kiam la infinitivo rilatas al substantivo, estas konsilinde meti komon, se inter la substantivo kaj la infinitivo troviĝas pluraj frazelementoj: *Z. lasis plenan liberon al ĉiu esp-isto, uzi la komon laŭ sia gepatra lingvo*.

7. inter komojn oni metas plurajn frazelementojn starantajn inter la subjekto kaj la predikato: *fine, mia amiko, ne sen grandaj malfacilaĵoj, finis sian taskon*.

8. komon oni metas inter kunorditaj prop-oj: *mi vokis lin, sed li ne venis; ĉu vi aranĝos ĉion mem, aŭ mi devas vin helpi?; la libro estas sur la tablo, kaj la kraĵono kuŝas sur la fenestro*².

Rim. V. Mankas la komo inter kunorditaj prop-oj ligitaj per kaj kaj aŭ, se tiuj havas la saman subjekton, elipsan en la dua prop-o: *li foriris kaj ne revenis plu; ĉu li dormas aŭ mortis?* Sed ankaŭ tiaokaze oni metas komon, se la konjunkcio estas sed: *li ĉion promesis, sed nenion faris*.

9. Per komo oni apartigas suborditajn prop-ojn disde la ĉefprop-o. Kompreneble, intermetitajn subprop-ojn oni devas meti inter du komojn. Ankaŭ la rilatajn prop-ojn (enkondukitajn per rilativo) oni devas apartigi per komo: *mi vidis, ke li venas; diru, kiam vi estos preta; mi ne scias, ĉu tio estos oportuna; li faris nenion el tio, kion li promesis; la virinon,*

kiu vin tiom interesas, mi vidis hodiaŭ sur la strato; min ĝenas la bruo, kiun vi faras; kiu riskas, gajnos; li ne venis, ĉar li estas malsana; se foriras la katoj, festenas la ratoj; kvankam la aferoj statas malbone, vi ne devas malesperi. Komon oni metas ankaŭ, se la subprop-o estas elipsa: tiu varo, kvankam tre delikata, estas malmultekosta; fine, kvankam malfrue, li venis; tiu sciigo, se vera, estas tre grava.

Se la subjunkcio estas antaŭata de prepozicio, la komon oni metas antaŭ la prepozicion. Same oni procedas ĉe adverboj: *mi iras tien, escepte se...; mi ne atendis plu, opiniante ke...; li foriris, sen ke...; vi habilis, anstataŭ ke...; li venis, por ke...; ni ekskursos, supoze ke...; mi iros tien, kondiĉe ke...; mi promesas tion, esperante ke...* Sed se la prepozicion sekvas tio, aŭ la adverbbon tion, oni metas la komon antaŭ la subjunkcio: *li konvinkis min per tio, ke...; li foriris sen tio, ke...; mi venis por tio, ke...; li ne venis spite tion, ke...*

Oni povas ellasi la komon antaŭ postmetitaj subprop-oj enkondukitaj per rilativo, se en la ĉefprop-o mankas la demonstrativo. Nome, tia-okaze oni povas rigardi la rilativon apartenanta samtempe al la ĉefprop-o kaj subprop-o: *faru kion mi ordonis; donu la libron al kiu vi promesis; la feino povis sin transformi en kion ŝi volis; gajnos kiu riskas.*

El la sama kaŭzo, kutime oni ne metas komon antaŭ elipsa kiel- kaj kvazaŭ-prop-oj, ĉar antaŭ ili mankas la demonstrativo tiel: *li venis kiel delegito; oni elektis lin kiel prezidanton; oni akceptis lin kvazaŭ reĝon.* Sed oni metu la komon, se la respektivaj prop-oj estas antaŭ- aŭ intermetitaj: *kiel prezidanto, li certe aranĝos tion; al vi, kiel al mia amiko, mi konfidos la sekreton.* Krome, ŝajnas pli bona meti komon, se la prop-o estas kompleta: *li iris, kvazaŭ li estus ebria; li zorgis pri li, kiel patro zorgas pri sia filo.*

Pri tiel ke vd. § 265.

Rim. VI. En la matematiko, komo estas uzata por apartigi la entjerojn disde la decimalaj frakcioj: 3,5 (tri kaj kvin dekonaj).

Punktokomo

10 *Punktokomon* oni uzas por apartigi prop-ojn pli distinge ol per nura komo. Oni do bezonas ĝin:

1. por apartigi logike interligitajn kompleksojn de ĉefprop-o plus subprop-o: *"vi ludas; mi vin petas, batu forte; mi timas, ke vi faras kun mi ŝercojn"*.

2. inter prop-oj, el kiuj la dua rilatas al la unua ne per rilatpronomo, sed per montra aŭ persona pronomo: *en la unua etaĝo estas ĉambro de Karlo; en ĝi nun neniu loĝas – donu al mi la libron, kiun vi fus aĉetis; mi volas ĝin trarigardi – vi demandas min pri sinjoro X; sed tiun mi ja ne konas.*

Cetere, la uzo de punktokomo ne estas strikte fiksebla; ĝi dependas de la okaza neceso evidentigi pli klare la konstruon de la frazo, kaj eĉ de individuaj kutimoj.

Dupunkto

Dupunkton oni uzas:

1. antaŭ citaĵo (rekta parolo): *li diris: "Mi ne volas..."*
 2. antaŭ eksplika nombrado: *li aĉetis multajn frandaĵojn: kukon, marcipanon, torton ktp.*
 3. antaŭ eksplika klarigo: *tion oni povas plej bone vidi el la sekvanta fakto: oni scias, ke estas grandega multo...*
 4. antaŭ prop-o montranta la rezulton de la antaŭa: *iru kaj rigardu: vi vidos, ke...*
 5. antaŭ resuma ekvivalento: *la plej granda trezoro de la homo: la vivo.*
- Rim. En la matematiko la dupunkto signas proporcion. Vd. § 87 G.

11

Krisigno kaj demandosigno

Krisignon kaj *demandosignon* oni uzas post frazoj emfazaj aŭ demandaj. Oni ne uzas demandosignon post dependaj demandoj, se la ĉefprop-o mem ne estas demanda. Do: *demandu lin, kiam li estos preta; mi ne scias, kiel li fartas. Sed: ĉu li skribis, kiam li venos?*

12

Tripunkto

Tripunkton oni uzas:

1. por signi ion nediritan sed diveneblan el la antaŭa teksto: *por unu monato tio sufiĉos, sed poste...; vi estas prava, sed tamen...*
 2. por altiri la atenton pri sekvanta esprimo, aŭ por enkonduki ion neatenditan: *fokstroto estas... koksfroto; la originalaj poetoj nuntempe estas tro... malmutaj.*
- Samcele oni povas uzi ankaŭ la haltostrekon (vd. tuj).

13

A. – Haltostreko

La *haltostreko* estas uzata:

1. anstataŭ tripunkto (vd. tie, sub 2.).

Rim. I. La haltostreko tre forte emfazas la vorton, antaŭ kiu ĝi staras, precipe se ĝi estas vorto sola. Tial estas konsilinde ne apartigi per ĝi unusolan vorton, sed meti ĝin antaŭ la artikolo aŭ antaŭ kromaj aliaj vortoj de la frazo. Do ne: *onidire, li estas la – patro; tamen, tio estas – escepto.* Sed: *onidire, li estas – la patro; tamen, tio – estas escepto.*

2. anstataŭ komo, por apartigi intermetitajn prop-ojn pli forte ol per komo: *fine, pli aŭ malpli frue – se la demando ne estos solvita de la societo mem – la registaroj de ĉiuj landoj devos cedi²...; ... ĝi estas – aŭ almenaŭ devas esti – nur stilo simpla kaj logika²; la afero – mi ne dubas pri tio – devas prosperi².*

3. por pli evidentigi la konstruon de longaj frazoj, apartigante per ĝi plurajn subprop-ojn disde la ĉefprop-o. Tiu ĉi uzo dependas de individuaj kutimoj kaj apenaŭ estas strikte fiksebla per reguloj.

4. por signi dialogon (vd. Rekta Parolo; § 217).

14

5. antaŭ resuma apozicio (§ 130).

6. por fini vorton ellasante ties finon: *en la jaro 18—, mi loĝis en la urbo G—* (K).

7. por signi ĝis inter du datoj: *en la jaroj 1885—1900*.

Rim. II. Kelkaj verkistoj uzas haltostrekon por signi, ke la vortordo estas inversa, aŭ, ke el la frazo mankas la predikato: *min vekis matene — ŝiaj kisoj; via domo havas tegmenton tegolan kaj la mia — ŝindan*. Tia uzo estas tute superflua kaj ankaŭ misefekta, ĉar ĝi donas fortan emfazon al vorto ne bezonanta tian. Plej-ofte oni bezonas tiaokaze nenian interpunkcion; la supraj frazoj, ekzemple, tute ne estas malpli klaraj sen la haltostreko. Tamen, se en senpredikata frazo apudiĝas subjekto kaj adjektiva predikativo, oni sentas la neceson de interpunkcio, ĉar sen ĝi la predikativo ŝajnus epiteto. Tiaokaze prefere oni uzu simplan komon, kaj, se ekzistas kroma komo, oni metu anstataŭ tiu punktokomon: *la granda tablo estas bruna; la malgranda, blanka; la tempoj estas grandaj; la homoj, malgrandaj*. Aŭ, oni uzu inverson: *grandaj estas la tempoj, malgrandaj la homoj*.

Rim. III. En la matematiko, la haltostreko signas subtrahon: $8 - 2 = 6$. Vd. § 87 G.

B. — Dividstreko

La *dividstreko* estas uzata:

I. En la kunmetitaj vortoj por pliklarigi ilian konstruon. Oni uzas ĝin tiacele:

a) en pli-ol-du-radikaj kunmetoj; la dividstrekon oni metas tiel, ke ĝi apartigu duoblajn flank- kaj ĉefelementojn disde unuoblaj aŭ duoblaj ĉef- aŭ flankelementoj: *aŭto-aerbremsa, vaporsip-asocio, or-kandelingo, turhorloĝ-montrilo, poŝtmark-kolekto*. Do ne: *aŭtoaer-bremsa, vaporsipasocio*.

b) en duradikaj kunmetoj nekutimaj, por fari ilin pli rekoneblaj: *sentema, ve-kanto, sku-puŝo, tern-incito*. Estas konsilinde uzi ĝin, kiam la dua radiko komenciĝas per vokalo: *bel-aspekta, kulp-atesta, bronz-armilo*. Sed oni ne uzas dividstrekon antaŭ kaj post afikso aŭ afiksoido: *dormema, beleta, ekiri, malamo*. Male, estas konsilinde ĝin uzi, se sufiksoido funkcias kiel flankelemento: *il-riparo, an-elekto*.

c) kutime oni uzas dividstrekon post flankelemento kun konservita finaĵo: *membro-abonanta, sento-uragano, majstro-oratoro*; kaj nepre, se ankaŭ la pluralsigno estas konservita: *esperantistoj-amikoj, soldatoj-kamaradoj*.

d) estas konsilinde uzi dividstrekon, se en kunmeto apudiĝas du samaj konsonantoj: *gratul-letero, fer-rubando*. Sed ĝi estas superflua post prefiksoj aŭ en kutimaj kunmetoj: *ekkuri, rabbirdo, sammaniere*.

e) oni uzu dividstrekon, se al adjektivo rilatas adverbo kunskribita: *ore-purpura, pale-verda*; se la verba radiko, al kiu la flankelemento estas rilatigita adverbe, estas partecipe plukonstruita (vd. § 128 Rim. II): *unue-naskito, malfrue-veninto, desegne-kovrita*; se adjektivoj rilatantaj senpere al la sama substantivo estas kunskribitaj: *franca-germana vortaro; ruĝa-blanka-blua standardo*.

f) per dividstreko oni anoncas, ke al la vorto apartenas la lasta parto de la sekvanta kunmeto: *la ligno- kaj fer-konstruaĵoj*.

g) dividstreko signas ellasitajn literojn interne de vorto: *Esp-o, D-ro, F-ino*.

II. Por transporti parton de vorto, pro lokmanko, en la sekvantan linion.

Zamenhof ĉi-rilate donis la konsilon, ke la vortojn oni dividu laŭ iliaj partoj gramatikaj, ĉar "ĉiu parto gramatika en nia lingvo prezentas apartan vorton". Do: *Esper-anto, ricev-ita, dorm-ema, ek-ir-igi*. Sed cetere la tutan demandon li rigardis malgrava, "afero tute papera" kaj diris permesebla eĉ la transporton de unu sola litero (*aparteni-s*).

Tia absoluta libero tamen ne estas konsilinda, ĉar ĝi ĝenas dum lego. Plej bone estas sin teni al la sekvantaj reguloj:

A. Vortojn, konsistantajn el pluraj gramatikaj partoj, oni dividu laŭ tiuj partoj (radikoj, afiksoj, afiksoidoj); sed oni esceptu la finaĵojn. Do: *ek-iri, kri-ante, ĝu-ado, eks-oficiro, best-ama, sento-plena, herb-riĉa, mezur-ilo, instru-ist-ino, long-vokala*.

B. Vortojn unuradikajn oni dividu laŭ la silabado. Tio estas:

a) se la silabojn ligas unu konsonanto, ĝi transiras al la dua silabo: *ba-lo, sce-no, ko-le-ro, pa-ĝo*. Kompreneble ĉe silaboj ligitaj sen konsonanto la divido okazas inter la du vokaloj: *entuzi-asm-o*. Tiajn silabojn, vokale finiĝantajn, oni nomas *malfermitaj* aŭ *apertaj*; pri ilia prononco vd. § 21.

b) se la silabojn ligas du konsonantoj, oni dividas la vortojn inter tiuj: *san-go, foj-no, sol-vi, ar-bo*. Tiajn silabojn, konsonante finiĝantajn, oni nomas *fermitaj*.

Rim. I. Se la dua konsonanto estas likvido (*r, l*), ambaŭ konsonantoj povas kune transiri: *pa-tro, kapa-blo, ci-trono, sa-bro*. Pri ilia prononco vd. § 20. Rim. I. Ne estas fiksebla provizore la divido ĉe *kv, gv, ks, kz* (ĉu *ak-vo* aŭ *a-kvo, komplek-so* aŭ *komplek-so*?).

c) se la silabojn ligas tri konsonantoj, unu restas ĉe la antaŭa silabo, la du ceteraj transiras; tiaokaze, cetere, la tria konsonanto estas ĉiam likvido aŭ *v*: *lin-gvo, as-tro, es-tro, on-klo, nom-bro*. Sed se la unuaj du konsonantoj estas *ks*, ili restas ĉe la antaŭa silabo: *eks-centra, eks-pozicio, eks-perimento, eks-tera*.

d) se la silabojn ligas kvar konsonantoj, oni dividas ilin po du: *eks-pluati, eks-plodo, mons-tro, eks-tra, ojs-tro*.

Rim. II. Apud la ĉi-supra plej logika sed iom komplika maniero tranĉi la vortojn, oni renkontas ankaŭ alian, pli simplan, laŭ kiu oni tranĉas la vortojn ĉiam antaŭ vokalo; la sola escepto estas la kunmetitaj vortoj, kies dua elemento komenciĝas per konsonanto, kaj ĉe kiuj oni devas apartigi ĝin per dividstreko. Tia tranĉomaniero ŝajnas eĉ konforma al la karaktero de lingvo, en kiu abundas la sufiksoj komenciĝantaj per vokalo: *manĝ/eg/em/ul/o, skrib/ist/aĉ/o, rid/ind/ec/o*: (sed: *lu-prez/o, mal-pur/a* ktp). Ĝi estas precipe oportuna, kiam oni presigas libron per neesperantistaj kompostistoj; tial ĝi estis uzata en la Londona Biblio, kaj en la verkoj de la Franca Esperanto-Instituto.

15 La apostrofo servas por signi elfalantan literon: la *a* de l' artikolo (vd. § 76); kaj la *o* de la eliziaj substantivoj (vd. § 29 kaj § 277. Rim.; kp. ankoraŭ § 300. Rim. IV).

Rim. I. En la poezio okazis provoj ellasi la apostrofon de l' o-finaĵo: *amanta kor*. Sed ili restis izolitaj.

Oni provis ellasi la artikol-apostrofon antaŭ vokale finiĝanta prepozicio, kunskribante la prepozicion kun la artikolo: *ĉel, del, prol, pril*. Sed tio, kvankam ne maloportuna, estis sufokita de ĝenerala indigno.

Rim. II. Z. plejkomence uzis specon de rekta komo aŭ apostrofo por dividi la elementojn de vortoj; li volis per tio komprenebligi la tekston al ne-scianto de la lingvo, ebligante la elserĉon de la elementoj el vortaro: *kompre'n'eb'l'ig'i*. Lastatempe oni ree trovas kelkloke la uzon de ordinara apostrofo ĉe komplikaj vortkunmetoj. Tio tamen ne estas konsilinda. La apostrofo ja markas finon de substantivo (*kompre'n'*), ĝi do povas esti unuavide rekte erariga, se oni signas per ĝi ĝuste ne-finan: *ĉe la vagonar'haltigilo* (haltigilo ĉe la vagonaro?). Oni uzu, laŭ la ĝenerala kutimo, dividstrekon: *vagonar-haltigilo*. Tio estus eble pli oportuna ankaŭ inter neasimilita propra nomo kaj Esp-a finaĵo, kie oni plej ofte uzas apostrofon: *Columbus-on, Alice-n*.

Rim. III. Grabowski kaj kelkaj aliaj uzis ofte apostrofon en kunmetitaj vortoj antaŭ dividstreko, por signi la substantivecon de la flankelemento: *okul'doloro* (sed *rapid-mana*). Sed tio, tute superflua, ne ĝeneraligis.

Rim. IV. La redaktintoj de la Londona Biblio uzis en la Biblio apostrofojn, por distingi vortojn hebreajn disde E-aj homonimoj: *bat'o, kor'o*.

Citiloj, krampoj, parentezo, steleto

16 1. *Citilojn* oni uzas por citi (kp. § 132.2 kaj 227). Ili estas diversspecaj, jen surliniaj, jen eksterliniaj. La surliniaj havas formon de duobla akuta angulo; sed la orient-eŭropaj presistoj kutimas direkti la pinton de la angulo al la citaĵo: *li kriis: »Helpon!«*, dum la okcident-eŭropaj aranĝas ilin inverse: *li kriis: «Helpon!»*. La eksterliniaj havas formon de komo, jen unuobla, jen duobla; jen ambaŭ kuŝas sur la supro de la linio, jen unu kuŝas malsupre, antaŭ la citaĵo, kaj la alia supre, post ĝi: *li kriis: "Helpon!"* aŭ *li kriis: „Helpon!”*. La unuoblaj signoj estas uzataj precipe ĉe la anglaj presistoj: *li kriis: 'Helpon!'*.

2. *Krampojn* oni uzas por intermeti ion gramatike sendepandan de la ĉirkaŭa frazo (kp. § 132.2). Ili estas trispecaj: la rondaj (...), la rektaj [...], kaj la angulaj < >. Oni uzas ordinare la rondajn, kaj oni rezervas la rektajn por eviti konfuzon, se du parentezoj sin sekvas kun diversa valoro:

...mi pensas, ke ĉiuj konsentos kun mi pri tio. ("L'Espérantiste", Junio 1904). [Tiu n-ro aperis efektive meze de Julio].

aŭ se unu kuŝas interne de alia:

Vidu en Privat (Vivo de Zamenhof [dua eldono] p. 118)...

Rektajn aŭ angulajn krampojn oni uzas precipe, se oni volas montri, ke la parentezo ne apartenas al la originala teksto, ĉu ĝi estas margena

aldono de la aŭtoro, aŭ klariga rimarko de la komentisto:

Multaj el ili vivas ankoraŭ [ŝanĝo ne estas okazinta] ... *Sed, ho ve, multaj el niaj pioniroj jam ne vivas* [ŝanĝo okazis].

aŭ konjekto de la tekst-eldonanto: *lia aŭtoro*<ta>*teco*.

Aparta speco de krampo estas la *kuniga*, uzata en tabeloj ktp., por prezenti sur la sama ŝtupo du aŭ plurajn aferojn:

$$\text{Vertebruloj} \left\{ \begin{array}{l} \text{Mamuloj} \\ \text{Birdoj} \\ \text{Fiŝoj ktp.} \end{array} \right.$$

Rim. I. La intermetitaĵon oni nomas *parentezo* (Kp. § 132.II Rim. I). Kelkfoje oni uzas tiun vorton ankaŭ por nomi la krampojn, sed tio estas evitinda.

Rim. II. *Malfermi* la parentezon estas meti la unuan krampon; *fermi* la parentezon estas meti la duan.

Rim. III. Ĉiu el la du angulaj krampoj estas aparte uzata en la matematiko, por montri neegalecon:

$A > B$: A pli granda ol B

$A < B$: A pli malgranda ol B

kaj en la lingvistiko, por montri la transformon de vortoj:

Pfeil < *pilum* : *Pfeil* devenas de *pilum*

domina > *donna* : *domina* fariĝis *donna*.

Rim. IV. En la matematiko, la parentezo signas, ke la interkrampaj nombroj formas unu tuton rilate al alia nombro: $3(5 + 4) = 3 \times 9$. Laŭ simila signifo ni uzis ĝin en la vortfarado; ekz-e (*bonfart*)-o signas, ke la o-finaĵo rilatas ne al *fart* sola, sed al ambaŭ elementoj (*bon + fart*) kune.

3. *Steleto* havas du rolojn; ĝenerale ĝi servas por atentigi pri noto, ĉe la paĝpiëdo; kun tiu celo oni uzas ankaŭ ciferetojn, metitajn iom supren de la linio; kelkaj presistoj aldonas al tiuj ciferetoj ankaŭ ferman krampon. La ciferetoj estas pli taŭgaj, se troviĝas pluraj notoj sur la sama paĝo, ĉar vico de du, tri ktp. steletoj post vorto rompas la kontinuecon de la linio. Cetere oni kelkfoje uzas ambaŭ rimedojn, ekz-e en traduko, por apartigi la notojn de la aŭtoro disde tiuj de la tradukinto.

La dua rolo de la steleto, metita antaŭ vorton, estas signi ĝin kiel neekzistantan vorton en la lingvo (neologismo proponita, aŭ formo ne ekzistanta, sed supozata por faciligi klarigon de alia vorto).

II. FONETIKO

SONOJ KAJ LITEROJ

17

La Esperantaj sonoj, kiel ĉe ĉiu alia lingvo, konsistas el vokaloj (a, e, i, o, u) kaj konsonantoj (b, c, ĉ, d, f, g, ĝ, h, ĥ, j, ĵ, k, l, m, n, p, r, s, ŝ, t, v, z). Krome ekzistas la duonvolako ŭ, prononcata simple kiel mallonga u. Ĉiu vokalo, sola, aŭ kun la apudaj konsonantoj, formas unu silabon. La duonvokalo ŭ neniam formas apartan silabon kaj tial povas troviĝi nur post vokalo: *aŭ, eŭ, oŭ*; malofte antaŭ vokalo: *ŭa* (zamenhofa imito de infanetploro); *ŭo* (la nomo de la litero); *ŭaks* (z-a onomatopeo) (*).

Rim. Ni nomas la ŭ-sonon duonvokalo, ĉar ĝi havas la sonon de vokalo (mallonga u), sed ĝi ne formas silabon, same kiel la konsonantoj.

Esperanto estas t.n. fonetika lingvo, t.e. al la sama litero respondas ĉiam la sama sono kaj reciproke. Tamen, ne ekzistas absolute fonetika lingvo, kaj ĉi-rilate ankaŭ E-o ne estas escepto.

Rilate al la *vokaloj*, estas sendube, ke E-o havas pli multajn sonojn ol literojn. Al unu litero respondas almenaŭ du sonoj, diferencaj laŭ longo, kelkfoje eĉ laŭ koloro.

Rilate al la *konsonantoj*, la fonetikeco estas pli obeata, almenaŭ ĉe perfekta prononco. Sed ankaŭ tie ĉi, precipe dum rapida parolo, ekzistas diverĝoj: ĉe senpera sinsekvo de konsonantoj voĉa kaj senvoĉa, neevitebla estas la sonkonformiĝo de unu el ili. Tiel oni prononcas prok-

(*) Teorie oni povas distingi kvar duonvokalojn:

1. i-sonon kaj u-sonon troviĝantajn post alia vokalo kaj formantajn kun tiu unu silabon. En tiu okazo, la buŝo vaste malfermiĝas por prononci la unuan vokalon (*a, e, o, u*) kaj dum ties fermiĝo aŭdiĝas la "duonvokalo" mallongigita. La diferenco inter tiu i-sono kaj la j-konsonanto estas tre subtila, tial ankaŭ ne estas necese havi por ĝi apartan literon; en E-o oni signas ĝin per simpla *j*. Fonetike eble oni povus distingi ĝin per *y*: *homoj* [homoy], *plej* [pley]. La u-sonon oni signas per *ŭ*: *baldaŭ, aŭdi*.

2. i- kaj u-sonon troviĝantajn antaŭ vokalo kaj post konsonanto kaj aŭdiĝantajn dum la malfermiĝo de la buŝo. En Esp-o ili ekzistas nur, kiam en la poezio la ritmo mallongigas ordinaran *i* kaj *u*: *kormilionoj* [kormilyonoy], *buduaro* [budŭaro].

Krome ekzistas la konsonanta *j* (vortkomence, aŭ inter du vokaloj (*jen, foje*)). Al ĝi respondus la vortkomenca ŭ (fonetike: *w*), estigata preskaŭ ne per la voĉkordoj, sed per la lipoj. Sed ĝin oni trovas nur en kelkaj proponitaj vortoj (*waĉi, wato*).

simume: *absolute* (absolute), *ogdek* (okdek), *egzisti* (ekzisti), *lonktempe* (longtempe), *glafsonoro* (glavsonoro) ktp. Ĉar tiu asimilado de unu konsonanto al la sekvanta (t.n. regresiva) estas konata de tre multaj lingvoj, ĝi estas tolerebla ankaŭ en E-o. Zamenhof aludas ankaŭ tri analogajn tolerojn: elparolo mola de la *n* antaŭ *j* (*panjo*, *sinjoro*), naza de la *n* antaŭ guturalo (*sango*, *fingro*) kaj interŝovo de *j* inter *i* kaj alia vokalo (*mia*, *mielo*); sed li insistas, ke "se ni deziras paroli severe regule, ni devas elparoli *pan-jo*, *san-go*, *mi-a*" (kun la samaj sonoj kiel en *pan' jubilea*, *san' genta* aŭ *mi amas*.)

AKCENTO

- 18** La akcento troviĝas senescepte sur la antaŭlasta silabo. Do (se la akcenton ni signas per kursiva vokalo) oni diras: *ami*, *amanta*, *sendi*, *sendito*, *tiri*, *tirita*, *kovri*, *kovrota*, *plumo*, *plumujo*. Kiel ni diris, ŝ ne estas kalkulata kiel silabo: *balau*, *baldaŭ*. Unusilabaj vortoj ĝenerale estas senakcentaj; ili ricevas akcenton nur, se la senca akcento falas sur ilin: "Mi parolas ne al *vi*, sed al *ŝi*; serĉu ĝin ne *sur* la tablo, sed *sub* la tablo".

SILABOJ

- 19** Ĉiu vokalo, escepte de ŝ, respondas al aparta silabo. Inter la silaboj ni distingas:
1. Silabojn *longajn*: tiaj estas:
 - a) ĉiuj silaboj, kiuj enhavas vokalon longan (vd. poste);
 - b) ĉiuj silaboj, en kiuj la vokalon sekvas pli ol unu konsonanto.

Rim. I. La longaj silaboj povas esti akcentaj kaj senakcentaj. La senakcentajn longajn silabojn oni povas rigardi ankaŭ mallongaj en la klasika metriko (silaboj hibridaj). La akcentaj longaj silaboj estas nepre longaj.
 2. Silabojn *mallongajn*: tiaj estas ĉiuj mallongvokalaj silaboj, en kiuj la vokalon sekvas vokalo aŭ ne pli ol unu konsonanto.

Rim. II. La mallongaj silaboj povas esti akcentaj (*mia*, *ties*) kaj senakcentaj (*amanta*, *kurado*). En la klasika metriko la unuaj povas esti rigardataj ankaŭ kiel longaj (silaboj hibridaj, enklitikoj), la senakcentaj estas nepre mallongaj.

Pri la silabado vd. §§ 14 B II kaj 21.

LONGECO DE VOKALOJ

- 20** La longeco de la vokaloj dependas de la akcento. Oni devas distingi inter *akcento* kaj *longeco* de vokalo. La akcento estas pli forta, pli laŭta prononco, do ĝi dependas de la *energio* de la voĉestigo; krome la akcenta vokalo ofte estas prononcata ankaŭ per iom

pli alta sono. La *longo* dependas de *daŭro*. La longo-diferenco inter la vokaloj longaj kaj mallongaj ne estas granda, sed ĝi estas ĉiam klare sentebla. Ĝin influas ankaŭ la parol-rapideco: ju pli rapida estas la parolo, des pli ĝi malpliigas. Male, ju pli emfaza estas la parolo, des pli evidentiĝas la longo-diferenco.

La fundamenta principo de la E-a prononco estas, ke la akcentajn silabojn oni elparolas ĝenerale pli longe ol la senakcentajn. Do, se la longeco de la silabo ne estas certigita per pluraj postvokalaj konsonantoj, oni certigas ĝin per la pli longa, tirata elparolo de la vokalo. Aliflanke, ĉe malpli gravaj vortoj, oni ne sentas la neceson de tio: tiujn do, malgraŭ la akcento, oni elparolas same mallonge kiel la senakcentajn.

Alia regulo de la E-a prononco estas, ke du akcentoj ne povas sekvi senpere unu la alian. Do en kunmetitaj vortoj la akcento de la flankelemento malaperas, sed ĝia loko o f t e restas markita per la pli longa prononco de la vokalo.

La longon de la vokalo ni signos per postmetita dupunkto (:).

Oni povas do eldiri la sekvantajn regulojn:

1. La akcentaj silaboj estas ĝenerale longaj:

a) se ilian vokalon sekvas pli ol unu konsonanto, tio mem certigas la sufiĉan longecon de l' silabo, do la vokalo mem restas mallonga: granda, sendi, finno, tondro, trunko. Mallonga estas la vokalo antaŭ ŭ (laŭdo, feŭda, poŭpo).

b) se ilian vokalon sekvas vokalo aŭ ne pli ol unu konsonanto, la longon de la silabo devas certigi la iom pli longa, tirata elparolo de la vokalo: a:mi, pe:ti, fi:no, ko:ro, ku:ri.

Rim. I. Se la dua el du sinsekvaj konsonantoj estas likvido (*r* aŭ *l*), la prononco de la vokalo ne estas unueca: oni trovas elparolon mallongan kaj longan (patro kaj pa:tro; kadro kaj ka:dro; febro kaj fe:bro; ebla kaj e:bla).

Rim. II. Antaŭ afrikato *dz* oni prononcas la vokalon mallonge (edzo, adzo), ĉar oni sentas ĝin du apartaj konsonantoj. Same, oni ofte aŭdas mallongan vokalon antaŭ *ĝ* kaj *c* (reĝo, kaĝo; beleco, peco), dum *ĉ* estas sentata kiel unu konsonanto (ka:ĉo, me:ĉo). Preferinde estus prononci longe la vokalon antaŭ ĉiuj afrikatoj, ĉar ili ja estas tamen po unu konsonanto, tiel ke la impreson de ilia dukonsonanta daŭro oni certigas plejofte per pli longa sonigo (eddzo, reĝgo, belecco). Pli ĝusta ŝajnas do la prononco: e:dzo, re:ĝo, bele:co. Tion postulas ankaŭ la parenkrimoj: edzo-peco, saĝo-kaĉo.

Rim. III. La elizio de o-finaĵo ne influas la longecon de la akcenta vokalo: a:m'; be:l'; dezi:r'; ko:r'; murmu:r'.

2. Pronomoj, numeraloj, prepozicioj, korelativoj havas mallongan antaŭlastan vokalon; tiu vokalo estas akcenta sed mallonga (vortoj duonakcentaj, enklitikoj). Tiaj estas: ili, oni, mia, via, ilia; unu, dua, tria, sesa, oka, deka; preter, apud, super; kiu, tio, ia, ĉies, kiam, tiom, ie, ĉial, neniel, nenio.

Rim. IV. Laŭ analogio pli kaj pli evidentiĝas la tendenco prononci mallonge la akcentan *i* en dusilabaj vortoj: kria, fia, pia, strio.

3. Unusilabaj vortoj (jam, tuj, ĵus, nun, tre, de, sen, per, mem, tri, kvar,

pli, plej) havas vokalon mallongan. Ili estas ankaŭ senakcentaj, escepte se senca akcento falas sur ilin. Tia senca akcento longigas la vokalon en *ho* kaj *ve* (ho: kaj ve:), ofte ankaŭ en *do* (do:).

Rim. V. Se unusilaba vorto estas finaĵe pluformita, ĝi ricevas akcenton. Rilate al la longeco oni ne povas eldiri firman regulon: oni aŭdas *jama* kaj *ja:ma*; *troa* kaj *tro:a*. La longa prononco ŝajnas preferinda.

Rim. VI. En poemoj, ĉiu vokalo de rimvorto ricevas longecon. Tiel estas eblaj la rimoj: min kaj vin'; nun kaj lun'; mem kaj sem'.

4. Du akcentoj ne povas stari sinsekve. Se en vortkunmeto apudiĝas du akcentoj, la antaŭa akcento perdiĝas, eventuale transdoniĝas al la antaŭa silabo, se tia ekzistas. Rilate al la longo de la eksakcenta vokalo validas la jenaj reguloj:

a) se la dua elemento estas sufikso aŭ sufiksoido, la vokalo de l' antaŭa radiko iĝas mallonga: ama:ta, dome:to, bati:ta, banu:jo;

b) se la dua elemento estas vera radiko, la longeco de la eksakcenta vokalo dependas de la kutimeco de l' kunmeto. Ĉe tre kutimaj kunmetoj la vokalo restas same mallonga kiel antaŭ sufikso; se ekzistas antaŭa vokalo, ĝi ricevas flankakcenton (kursiva litero), sed restas mallonga: alilo:ke, ĉieli:ro, militi:ro, vaporsî:po, verdi:re, versajne. En nesufiĉe kutimaj, maloftaj kunmetoj oni penas igi la vorton pli komprenebla per tio, ke ĝian vokalon oni lasas longa; ili do estas vokaloj longaj, senakcentaj: ko:rba:to, fe:rĉe:no, o:rĉe:no, vi:rvesto, pu:trando, a:mvi:vo ktp. Ĉe kelkaj vortoj la prononco ankoraŭ ŝanceliĝas; ekzemple oni aŭdas diservo kaj di:servo, l'bertempo kaj l'be:rtempo.

c) se la akcenta vokalo de la unua elemento ne estas senpere sekvata de la akcenta vokalo de l' dua elemento, ĝi konservas sian longecon, funkciante substantive en la kunmeto: mili:tprepa:ro; vapo:rbane:jo; ŝi:p-asoci:o. Sed la vokalo restas mallonga, kiam la elemento funkcias nesubstantive: boneduke:co, facilani:ma; belaspekta.

VASTEKO DE VOKALOJ

21 Oni devas distingi inter la longeco kaj la vasteco de vokaloj. La longeco estas demando de daŭro, la vasteco estas koloro.

La vokaloj *a*, *i*, *u* havas en kelkaj lingvoj formon vastan kaj malvastan, sed en la plimulto de lingvoj ne ekzistas tia distingo, do la diferenco estas neperceptebla por la anoj de la respektivaj lingvoj. Oni do povas ĝin tute neglekti en E-o, kaj diri, ke ĉe tiuj vokaloj oni distingas nur formojn longan kaj mallongan, sed laŭ vasteco ili estas samaj sonoj.

Male, ĉe la vokaloj *e* kaj *o* oni povas distingi formojn vastan kaj malvastan. Propre ili eĉ ne estas la samaj sonoj. La vasta *e* tiom diferencas de la malvasta, kiom tiu ĉi diferencas de la vokalo *i*. La malvasta *o* tiom diferencas de la vasta, kiom tiu ĉi de la vokalo *a*.

Ni signos la vastan *e* per *è*, la malvastan per *é*; la vastan *o* per *ò*, la malvastan per *ó*.

Pri tiuj ĉi kvar formoj oni tre multe diskutis en E-o.

Zamenhof konsilis uzi tiujn vokalojn en formo meza: "nek tro fermite (malvaste), nek tro malfermite (vaste), ĉiam meze". Sed tiu konsilo praktike ne estas aplikebla, ĉar ĝi necesigus, inter la du ekzistantaj formoj, formon mezan, kia apenaŭ ekzistas en iu ajn lingvo kaj tial eĉ kun la plej granda konstanta peno apenaŭ povus esti uzata konstante. Cetero, laŭ la disko, kiu konservas la voĉon de Z. kaj laŭ la tiutempaj atestantoj, li mem prononcis ĉiujn vokalojn relative tre vastaj.

Ĉefeĉ starigis tri regulojn:

1. La vokaloj, izolite, t.e. la nomoj de la vokaloj estas elparolataj malvaste kaj longe.
2. En nefermita silabo (t.e. silabo finiĝanta per vokalo) la vokalo estas elparolata malvaste.
3. En fermita silabo (t.e. silabo finiĝanta per konsonanto) la vokalo estas elparolata vaste.

Wüster distingas en E-o po du formojn: è (mallonga) kaj é (longa); ò (mallonga) kaj ó (longa). Do, laŭ li ne ekzistas longaj è kaj ò, nek mallongaj é kaj ó. Akcentaj silaboj nefermitaj estas longaj (é: kaj ó:), fermitaj estas mallongaj (è kaj ò). La fermitacon decidas la silabado (vd. § 14): unu konsonanto postvokala transiras al la sekvanta silabo, do la silabo restas nefermita (*pé-ti, kó-ro*); el pluraj konsonantoj almenaŭ unu restas apud la vokalo kaj per tio fermas la silabon (*dèks-tra, mònstro*).

Laŭ nia opinio la sistemo de *Wüster* estas plej proksima al la ĝenerallaj parolkutimoj. Sed laŭ nia sperto, en E-o ekzistas ankaŭ kvina formo, la longa vasta è (è:) kaj sesa, la longa vasta ò (ò:).

La diversajn vokalojn longajn kaj mallongajn, vastajn kaj malvastajn ni laŭeble klarigas kvarlingve en la apudmetita Tabelo.

Pri la uzo de la diversaj formoj de *e* kaj *o* ni kredas plej trafaj la jenajn konsilojn:

1. En silaboj senakcentaj oni uzu la mallongajn è kaj ò (vastajn): sènprètènda, bònanima, kè, dè, pòr, fòr.

Rim. I. Tiuj vokaloj estas elparolataj mallonge, do ne estas tro oreľrapaj. Tial tute ne estas grave, se oni prononcas, pro nacia kutimo, en tiaj lokoj mallongajn, malvastajn é kaj ó: sènprètènda, bònanima, ké, dé, pór, fór.

Rim. II. *Ho* kaj *ve* estas longaj, do ankaŭ malvastaj (*hó:, vé:*).

2. En silaboj akcentaj kaj sekvataj de ne pli ol unu konsonanto (silaboj nefermitaj) oni uzu la longajn é kaj ó (malvastajn): pé:ti, dé:vas; bó:na, só:la.

3. En silaboj akcentaj kaj sekvataj de pli ol unu konsonanto (silaboj fermitaj) oni uzu la mallongajn è kaj ò (vastajn): sèndi, vèsto; mònstro, pòrdo.

4. En silaboj eksakcentaj (t.e. akcenta silabo de flankelemento, kiu perdis sian akcenton, ĉar ĝin senpere sekvas la akcenta silabo de l' ĉefelemento) oni uzu la longajn è kaj ò (vastajn): libè:rètèmpo, fè:rĉe:no; ò:rĉe:no; kò:rba:to.

Tabelo de vokaloj laŭ vasteco kaj longeco

	angla	franca	germana	itala
a (mal-longa)	ne ekzistas (mallonge prononcata a:)	cadeau absolu latte	Land Kasten abreisen	basso fatto carro
a: (longa)	father last are	orage gaze vague	Rabe Schaden Pfad	cara male trovare
e (mal-longa)	rest men debt	perdre dette très	Ende Entwurf retten	modesto coperto mezzo
e: (longa vasta)	there fair pair	tête pleine jardinière	Bär zählen Gefährte	sei secolo materia
ĕ: (longa mal-vasta)	great* population* taste*	ne ekzistas (longe prononcata é)	lehnen Rede gewesen	sete cortese neve
i (mal-longa)	inn sister children	guitare gracilité triste	Witz finden mit	pittore si cinque
i: (longa)	meat field beneath	brise lire devise	Riemen Biene Lied	udire invidia giardino
o (mal-longa)	dog god boss	molle sottise logique	toll Soldat Rost	mondo molto colpa
o: (longa vasta)	fraud lord gone	fort tort nord	ne ekzistas	oro povero poro
ó: (longa mal-vasta)	stone** prose** both**	hausse eau prose	Bote Sohn Krone	perdono solo lettore
u (mal-longa)	put push book	soupé toucher vouloir	kurz muss unerhört	udire putto tu
u: (longa)	choose truly soup	août douze croûte	Mut bluten Spur	cura veduta luna

* Post la angla sono aŭdiĝas mallonga j-sono, kiu ne ekzistas en E-o.

** Post la angla sono aŭdiĝas mallonga ŭ-sono, kiu ne ekzistas en E-o.

La ĵus skizita prononcmankado de vokaloj estas iom komplikita. Sed ties kaŭzo estas, ke ĝi estas rezulto de libera evoluo. Tiu evoluo, malobeante la regulojn pri la ĉiama "meza kaj mezlonga" prononco de la vokaloj, iris siajn proprajn vojojn. Por la hodiaŭa esploranto restis nur konstati la rezultojn. Ni kredas, ke la malfacilojn oni ne povas ĉesigi per tio, ke oni simple neas ilin, sed oni povas ilin malpliigi per tio, ke oni starigas pri ili kiel eble simplan sistemon. Tia sistemo kondukas al la granda avantaĝo de unueca prononco. Precipe la teatraj prezentadoj kaj la deklamoj antaŭ internacia publiko dezirigas tian normadon: sendube, ĝuste ĝia manko ja malfaciligas la komprenon de rapida parolo per la nekutimeco de la aŭdata prononco. Pri tio povas helpi nur ĉie same instruata kaj lernata normo, al kiu ĉiu esp-isto devas almenaŭ klopodi.

Kiel ni diris, la prezentita normo estas rezulto de libera evoluo. Ĝi estas kvazaŭ filtrita el la internacia prononco (*). Sed oni ne povas diri, ke ĝi estas ĝenerale valida jam nun. Ekzistas diverĝoj laŭ nacioj kaj laŭ individuoj. Sed tiuj kontraŭdiras unu la alian, do oni povas ilin rigardi nedezirindaj apartaĵoj, nepravigeblaj esceptoj. Ekzemple:

Slavoj ĝenerale prononcas mallongan kaj vastan *e* en akcentaj silaboj (*pèti, vènis, dèvas*), dum la *a*-sonon ili longigas tiaokaze (*ka.ra, ba.ri*).

Germanoj diras vaste kaj mallonge: *dèvas, pòvas*, dum ili uzas longajn kaj malvastajn vokalojn en *lé:vi, kó:ro*.

Finnoj (la solaj) prononcas longajn *i* en *mia, via, kiu* ktp.

Hungaroj longigas kaj malvastigas la *o*-finaĵon (*hó:mó::; amantó:*), kaj diras preskaŭ vastan *o* anstataŭ la mallonga *a*; tro malvastan *é*, preskaŭ *i*, anstataŭ la longa vasta *é*:

Kelkloke oni diras longan vastan *è*: anstataŭ malvasta *é*:, precipe antaŭ vokalo kaj *r*: *vè:re, perè:o*.

Francoj, pro malĝustaj lernolibroj, emis prononci ĉiujn *e* kaj *o* malvastaj, sed tio pli kaj pli malaperas.

Angloj sonigas mallongan *i* post longa *é*: (*pé:jtis*) kaj *ŭ* post longa *ó* (*sinjó:ŭro*), sed ankaŭ tio malaperas.

Sed la ĝenerala tendenco tamen validas laŭ la supre skizitaj principoj; la supra sistemo estas unuecigo kaj normigo, per ĝi estas klare konstateble, kio konformas al tiu tendenco kaj kio devias sekve de aparta, pli-malpli izolita, do neimitinda, kutimo.

Ĝenerale, oni povas diri, ke la longeco de la akcentaj vokaloj estas la plej grava punkto en la E-a prononco. Diferencoj de vasteco estas ja tuj konstateblaj, sed ili ne influas la kompreneblecon de la parolo. Male, la egallonga prononco de ĉiuj vokaloj estigas malagrablan, abruptan, maŝinpaŝmanieran prononcon kaj konfuzas la aŭdanton, nekutimigintan al tia parolvetkuro. La longaj akcentaj vokaloj donas eblon, ke oni ripozu sur ili kaj malrapidigu la fluon de la parolo je certaj, vari-ritme

(*) Cetere, ĝi ricevis la aprobon de pluraj spertuloj, inter ili Andreo Cseh (Harlema Kongreso, 1954).

alternantaj distancoj. La egale tiratan elparolon de la vokaloj (é:ntu:zi: a:smo:), kiun de Beaufront iam rekomendis, neniu uzas plu: "long-vokaluloj" ne ekzistas plu en Esp-o.

Rilate la akcentadon de la vokaloj, oni devas rimarkigi, ke la ĝusta akcentado ne insistas pri la akcenta prononco de ĉiu dua silabo. Tia maŝina, tiktaka prononco estas maleleganta, peza, rekte teda. Plenan akcenton havas nur la plursilabaj radikoj sur sia antaŭlasta silabo. Sur la unusilabaj vortoj kaj sur la apenaŭ senteblaj duonakcentoj de la enklitikoj la parolo kvazaŭ traglitas. Tiel la parolo ricevas agrablan, nenueigan ondadon, kies ĉarmon donas ĝuste tio, ke la distanco inter la ondokulminoj konstante varias.

* * *

Resumo: La senakcentajn silabojn ne zorgu.

Ĉe la akcentaj silaboj:

a) se ili finiĝas ĉe la silabado per vokalo (t.e. se ilian vokalon sekvas malpli ol du konsonantoj): *be-la, hero-o* – prononcu la vokalon longa kaj malvasta;

b) se ili finiĝas ĉe la silabado per konsonanto aŭ duonvokalo (t.e. se ilian vokalon sekvas pli ol unu konsonanto aŭ ŭ): *kor-do, feŭ-da* – prononcu la vokalon mallonga kaj vasta.

Rim. Diferenco de vasteco ekzistas nur rilate al e kaj o. Pri la silabado vd. § 14 B II kaj 21.

Elparolu klare (ne glutu) la finaĵojn!

Por ekzemplo ni donas tekston Zamenhofan kun marko de akcento kaj prononco de vokaloj. La akcenton ni markas per kursivaj literoj, la longon de vokaloj per postmetita dupunkto. La nesignitaj vokaloj estas mallongaj. La vastajn e kaj o ni signas per *è* kaj *ò*, la malvastajn per *é* kaj *ó*, sed nur en la akcentaj silaboj, la senakcentaj silaboj estas nesignitaj (kiel ni diris, ĉe ili la vasteco havas multe malpli gravan signifon).

Respondo al kapita:no Capé.

Ka:ra sinjó:ro! Vian manuskriptan artikó:lon mi lé:gis kaj hodi:aŭ mi ĝin reséndis al vi. La malĝó:jaj idé:oj, kŭjŭn vi esprí:mis pro la nó:vaj vòrtoj en la laste aperintaj vorta:roj, ŝajnas al mi tu:te senkaŭzaj; laŭ mia opini:o via tí:mo vé:nis nur de tio, ke vi ne tu:te ĝuste prezéntas al vi la eséncan signi:fon de tiuj pligrandigi:taj vorta:roj.

La nó:vaj vorta:roj ne ha:vas eĉ la pléj malgrandan inténcon detru:i la unué:con de nia lĭngvo. La só:la kaj netuŝebla fundaméto de nia lĭngvo rĕstas la "Universa:la Vorta:ro" kaj la nó:vaj vorta:roj ne ŝnĝas eĉ unu vòrton el tiu fundaméta vorta:ro; ilia cé:lo éstas nur dó:ni klari:gon kaj hĕlpon en tiuj oka:zoj, kiam la Universa:la Vorta:ro ne sufi:ĉas. Estas dezirinde, ke tiun ĉi idé:on la nó:vaj vorta:roj akcĕntu tu:te kla:re, por evi:ti ĉian malkompreni:ĝon.

KONSONANTOJ

22

Dum la prononco de vokaloj la buŝo ja formiĝas diversmaniere, sed la aerfluo trairas ĝin sen malhelpo. Male, dum la prononco de la konsonantoj (escepte de *h*) en diversaj lokoj de la buŝkanalo estiĝas malhelpoj, kiujn la aerfluo devas venki, aŭ devas eviti tra la nazo. Oni do povas dividi la konsonantojn

1. laŭ la estiĝloko;
2. laŭ la estiĝmaniero.

Krome parto el la konsonantoj estas *senvoĉaj*, t.e. ĉe ili oni aŭdas nur bruon estigitan de la frotiĝanta aŭ eksplodiganta aerfluo; la alia parto estas *voĉa*, t.e. la bruo estas akompanata de laringvibro.

A. Laŭ la *estiĝloko* oni distingas:

a) konsonantojn *lipajn*, aŭ *labialojn*. La malhelpo estiĝas per la lipoj. Tiaj estas: *p, b, f, v, m*.

b) konsonantojn *dentajn* aŭ *dentalojn*. La malhelpon formas la langopinto kun la supra dentvico. Tiaj estas: *t, d, s, z, c, dz, r, l, n*.

c) konsonantojn *gingivajn* aŭ *gingivalojn*. La malhelpo estas inter la langopinto kaj la dentkarno super la supraj antaŭaj dentoj. Tiaj estas: *ŝ, ĵ, ĉ, ĝ* (ŝuŝaj sonoj).

d) konsonantojn *palatajn* aŭ *palatalojn*. La malhelpo estiĝas inter la lando-dorso kaj la osta palato. Tiaj estas: *j, nj*. Krome la molaj *lj, tj* kaj *dj* (neekzistantaj en E-o).

e) konsonantojn *velajn* aŭ *gorĝajn* (*velarojn* aŭ *guturalojn*). La malhelpo estiĝas inter la lang-radiko kaj la mola palato (velo palata). Tiaj estas: *k, g, ĥ*. Al ili apartenas ankaŭ la velara *r* (la E-a *r* estas preferinde dentala) kaj la velara *n* (aŭdebla antaŭ *g* kaj *k*: lango, inko).

f) konsonanton *laringan* aŭ *laringalon*. La estiĝloko estas en la laringo; la voĉrubandoj proksimiĝas unu al la alia kaj per tio malvastiĝas la voĉbreĉo, sed ne tiom, ke la voĉrubandoj vibrus. La sola tia konsonanto estas *h*.

B. Laŭ la *estiĝmaniero* oni distingas:

a) konsonantojn *eksplozajn* aŭ *plozivojn*. La malhelpo de la aerfluo estas plena; ĉi tiun malhelpon la aerfluo subite ĉesigas kvazaŭ per eksplodo kaj dum tio estiĝas la konsonanto. Tiaj estas: *p, b, t, d, k, g*.

b) konsonantojn *frotajn* aŭ *frikativojn*. La malhelpo ne estas plena, estiĝas nur tre malvasta truo, kiun la aerfluo pene trapenetas, estigante dume la konsonanton. Tiaj estas: *f, v, s, z, ŝ, ĵ, ĥ, ĥ*.

c) konsonantojn *eksplozo-frotajn* aŭ *afrikatojn*. La malhelpo estas plena, sed dum la eksplodo ĝi ne ĉesas tute; restas malvastiĝo, kiun la eksplodiginta aerfluo devas ankoraŭ venki per frota trapenetra. Tiuj konsonantoj do estas miksitaj el du bruoj, sed la dua frikativa bruo ne aŭdiĝas aparte, nur nuancas la plozivan sonon. Oni do atentu, ke, kiel iam rimarkigis Z., temas ja pri *unu* sola konsonanto: "Via opinio pri *c, ĉ, ĝ* estas erara; estas vero, ke *kelkaj* nacioj elparolas ilin kiel *ts, tŝ, dŝ*, sed *ne* ĉiuj

nacioj tion faras". Samo estas, malgraŭ la dulitera skribo, pri *dz*.

d) konsonantojn *nazajn* aŭ *nazalojn*. La malhelpo estas plena; la aerfluo ĝin evitas tra la nazo. Tiaj estas *m*, *n*, *nj*, kaj la velara *n*.

e) konsonantojn *fluajn* aŭ *likvidojn*. La spirblovo vibrigas la pinton (*r*) aŭ la flankajn randojn (*l*) de la lango, kiu kaviĝas por formi resonujon. Tiaj estas: *l* kaj *r*. Likvido estas ankaŭ la velara *r*, ĉe kiu vibras la mola palato.

C. Fine laŭ la *voĉeco* oni distingas:

a) konsonantojn *senvoĉajn*, ne akompanatajn de laringvibro.

b) konsonantojn *voĉajn*, kiujn laringvibro akompanas.

En la sekvanta duvico la supraj estas la senvoĉaj, la malsupraj la respektivaj voĉaj konsonantoj:

p, f, t, s, c, ŝ, ĉ, k, ĥ(*), h,

b, v, d, z, dz, ĵ, ĝ, g, j, m, n, r, l.

Ĉe la nazaloj (*n*, *m*) krome resonas la nazkaverno, ĉe la likvidoj (*l*, *r*) la kavato formata de la lango.

La estiĝlokon kaj estiĝmanieron de la konsonantoj ni resumas en la sekvanta tabelo. La unua estas ĉiam senvoĉa, la dua estas voĉa. Se mankas la respektiva konsonanto, ni tion signas per "–".

	labialoj	dentaloj	gingivaloj	palataloj	velaroj	laringalo
plozivoj	p/b	t/d	–/–	–/–	k/g	–/–
frikativoj	f/v	s/z	ŝ/ĵ	–/j	ĥ/–	h/–
afrikatoj	–/–	c/dz	ĉ/ĝ	–/–	–/–	–/–
nazaloj	–/m	–/n	–/–	–/nj	–/–	–/–
likvidoj	–/–	–/l,r	–/–	–/–	–/–	–/–

Rim. I. Ne en ĉiuj lingvoj ekzistas ĉiuj E-aj konsonantoj.

Ekzemple en la franca mankas la afrikatoj, en la franca kaj itala la *h*, en la germana la *ĵ*, en multaj lingvoj la *ĥ*, en la japana la *l*, en la ĉina la *r*, en la finna la *b*, *d*, *g*, *f*, ktp. En kelkaj germanaj regionoj oni ne sufiĉe distingas inter la voĉaj kaj senvoĉaj konsonantoj.

Rim. II. La preferinda E-a *r* estas dentalo: la vibro okazas en la langopinto tuŝanta la supran dentvicon. La pozicio de la lango do estas la sama kiel ĉe la l-sono, sed ĉe tiu ĉi lasta vibras la *randoj* de la lango, ne ĝia pinto, kiu kuŝas senmove sur la dentoj; la aero elfluas duflanke de la lango.

(*) Ekzistas en la ukraina kaj en la rumana unu voĉa *ĥ*, kies uzado en E-o estas tolerebla, ĉar ĝi ne povas estiĝi konfuzon. (G.W.)

Rim. III. Por estiĝi konsonanton voĉan, oni devas vibrigi la laringon. Tion oni povas konstati per la fingro surmetita al la laringo.

Rim. IV. La konsonantoj voĉaj kaj la respektivaj senvoĉaj povas formi inter si rimojn: parenkrimojn (landa-pelanta; pipro-vibro).

Rim. V. *Duoblaj konsonantoj* (kk, ll) en oficialaj vortoj ne ekzistas (*brutte^z, regatto^z, villo^z* ktp. ne estas oficialigitaj), tamen kelkfoje estiĝas ĉe kunmeto aŭ renkonto de vortoj (*ellerni, ekkuri, ol la, sed do*).

Ilin oni prononcu nek duoble, nek simple unuoble, sed:

a) frikativojn, nazalojn aŭ likvidojn oni simple sonigu iom pli longe;

b) ĉe plozivoj (k, d, kaj similaj) oni formu unue la buŝon por la elparolo de la respektiva konsonanto; se oni akre aŭskultas, oni rimarkos, ke jam ĉe tiu kreo de la malhelpajo aŭdiĝas mallaŭte la koncerna sono (ferma sono). Nun oni iom paŭzu kaj nur poste oni eksplodigu laŭte la malhelpon. La tuto do aspektos jene (la parentezo signas la ferman sonon): e(k)...kuri, se(d)...do.

III. MORFOLOGIO KAJ SINETIO



LA FORMOJ KAJ ILIA UZADO

VORTOSPECOJ KAJ VORTOFUNKCIOJ

Difino de la vorto

Studinte ĝis nun la konsiston de la vorto, skriban kaj sonan, oni povas transiri al la esploro de la diversaj formoj, kiujn la konstruitaj vortoj alprenas en diversaj okazoj (deklino, konjugacio). Kiel ni diris (paĝo 22), tiun esploron ni kunligas kun la studo de la okazoj, kiam oni *uzas* tiujn diversajn formojn.

Nenio estas pli malfacila, ol difini la elementon de ĉiu ajn frazo: la vorton. Oni povas proksimume diri, ke ĝi estas silab(ar)o, memstare uzebla kaj esprimanta apartan ideon: *domo*, *aĝo*, *kuras* estas vortoj; oni povas eĉ diri, ke ankaŭ *o*, *as* ktp. estas vortoj, sed *-j* aŭ *-n* aŭ *-es* (en *kies*) ne estas vortoj.

La vortojn, rigardatajn en si mem, laŭ sia speco, sendepende de ilia funkcio en la frazo, oni nomas *parolelementoj* aŭ *partoj de la parolo*². La morfologio kaj sinetio okupiĝas pri tiuj parolelementoj.

La vortojn rigardatajn laŭ sia funkcio en la frazo oni nomas *frazelementoj*.

En la postaj ĉapitroj de ĉi tiu parto de la libro ni studos ĉiun *parolelementon* el du vidpunktoj: la formoj kaj la uzado. La pritrakto de la *frazelementoj* apartenas al la sintakso. En la sekvantaj du enkondukaj paragrafoj ni difinos la vortojn unue laŭ ilia speco, poste laŭ ilia funkcio.

Vortospecoj

La vortojn rigardatajn en si mem, t.e. la *parolelementojn* oni povas klasi en la jenajn tradiciajn kategoriojn:

la substantivo; ĝi esprimas ideon (*nomon*) de konkreta aŭ abstrakta estaĵo: *hundo*, *Sekspiro*, *Versajlo*, *belo*, *martelo*;

la pronomo; ĝi servas por anstataŭi substantivon aŭ esprimi malprecizajn ideojn pri afero aŭ persono: *mi*, *iu*, *ĉio*, *oni*;

la adjektivo; ĝi esprimas ideon pri kvalito aŭ determino, rigardatan apartenanta al iu aŭ io: *bela*, *homa*, *ioma*, *mia*;

la numeralo; ĝi esprimas kvanton aŭ kvantan rilaton: *du*, *tria*, *kvare*;

la verbo; ĝi esprimas ideon pri ago aŭ stato, rigardatan plenumata de iu aŭ io: *oscedas*, *dormu*, *kanti*;

23

24

la adverbo; ĝi esprimas ideon pri kvalito aŭ cirkonstanco, rigardatan karakterizanta agon aŭ alian kvaliton: *noble, alte, ie, tuj, hodiaŭ*.

la prepozicio; ĝi servas por submeti substantivon, pronomon, aŭ escept-okaze infinitivan verbon sub alian substantivon, sub verbon, adjektivon aŭ adverbom: ŝipo *el* fero; frapi *per* bastono; plena *de* mono; for *de* tiu ĉi domo; lernu *por* scii;

la konjunkcio; ĝi servas por ĉemeti du aŭ plurajn frazelementojn de samaj naturo kaj funkcio: *kaj, aŭ, nek*;

la subjunkcio; ĝi servas por submeti iun propozicion sub alian: *ke, kiam, se*;

la interjekcio, kiu estas aparte klasota; ĝi esprimas per si mem sola tutan ideon pri sento, alvoko, sendepende de la ĉirkaŭaj vortoj: *ho! fi! huŝ!*

Rim. Ordinare oni uzas la saman nomon por konjunkcio kaj subjunkcio, malgraŭ ilia tre malsama valoro: la subjunkcio ludas inter la propozicioj la saman rolon, kiun la prepozicioj inter la vortoj, dum la konjunkcioj ligas indifereinte vortojn aŭ propoziciojn. Tio klarigas, ke kelkaj prepozicioj estas samtempe subjunkcioj: dum kaj ĝis.

Vortofunkcioj

25

La supre difinitaj vortoj estas prezentataj solaj nur en leksikono. Kutime oni trovas ilin nur meze de grupoj da similaj vortoj esprimantaj tiun agon de la spirito, kiun oni povas nomi *opinio* (en logiko: *juĝo*).

Ĉiu aparta vortgrupo esprimanta tian, eĉ plej simplan opinion estas nomata *propozicio* (mallonge: *prop-o*); ekzemple: "*Sidiĝu!*" "*For la manojn!*" "*La muson manĝis la kato sub la lito*". Ni rigardu tiun ĉi lastan prop-on; oni facile distingas tie, ke la supre nomitaj vortoj ludas diversajn rolojn, kiujn oni nomas *gramatikaj funkcioj*. Kiel ni diris, la vortojn rigardatajn laŭ tiu funkcio oni nomas *frazelementoj*.

La diversaj frazelementoj estas la jenaj:

la subjekto – estas la afero, pri kiu oni asertas, ke ĝi plenumas ian agon aŭ staton (ekz-e: la kato).

la predikato – estas la ago aŭ stato, kiun oni asertas plenumata de la subjekto (ekz-e manĝis).

la objekto – estas la afero, kiu estas trafita de la ago, kiun plenumas la subjekto (ekz-e la muson).

la adjekto – estas ĉiu el la cirkonstancoj, inter kiuj plenumiĝas la ago aŭ stato de la subjekto (ekz-e: sub la lito).

El tiuj kvar frazelementoj la predikato havas apartan gravecon, ĉar ĝi estas kvazaŭ la cemento, kiu kuntenas la tri aliajn: tiu esenca rolo klarigas, kial ĝi povas esti kompletigata nur per objekto aŭ adjekto. Male, la tri aliaj frazelementoj povas esti kompletigataj per aliaj akcesoraj terminoj, kiuj estas duspecaj:

la epiteto: a d j e k t i v o senpere karakterizanta substantivon kaj

esprimanta ties unu kvaliton: *la blanka raso*; s u b s t a n t i v o senpere karakterizanta substantivon kaj esprimanta la kvaliton: *Napoleono, imperiestro*, aŭ la nomon: *la reĝo Karlo*; a d v e r b o, senpere karakterizanta adjektivon aŭ alian adverbon kaj esprimanta ties nuancon aŭ gradon de intenseco: *tre bela, iom peze*;

la suplemento, vorto esprimanta rilaton aŭ cirkonstancon de ĉia frazelemento krom la predikato. Oni povas distingi, laŭ la *karakterizataj vortoj*: suplementojn de *substantivo* (la domo *de Dio*), de *adjektivo* (preta *por ĉio*), de *adverbo* (norde *de la urbo*), de *nepredikata verbo* (morti *por la patrujo*). Laŭ la formo, la suplemento estas plejofte enkondukata de prepozicio, kiu precizigas la rilaton inter ĝi kaj la determinato (amo *al virinoj*, ĝardeno *antaŭ domo*), do la regula formo de la suplemento estas *prepozitiva*. Tamen, oni povas distingi ankoraŭ suplementon *akuzativan* (longa *tri metrojn*), *infinitivan* (kapablo *paroli*), kaj eĉ *adjektivan* (*antaŭdoma* ĝardeno) kaj *adverban* (*Parize eleganta*); sed tiuj estas ĉiam transformeblaj en prepozitivojn (longa *je tri metroj*, kapablo *de parolo*, ĝardeno *antaŭ domo*, eleganta *laŭ Parizo*). Kontraŭe, la vera epiteto ne toleras transformon: *blanka (domo)* aŭ *tre (bone)* ne estas esprimeblaj prepozitive.

Rilate al la suplemento aŭ epiteto, la vorto kompletigita de ili estas nomata *determinato*.

Fine, ĉiuj terminoj de prop-o, krom la subjekto kaj la predikato, povas ricevi la ĝeneralan nomon *komplemento*.

Komplementoj povas do esti: la objekto (komplemento objekta), la adjekto (komplemento cirkonstanca), la epiteto kaj la suplemento (komplementoj akcesoraj).

Ĉiuj tiuj komplementoj povas esti laŭ *rektaj* (se ilin antaŭas nenia prepozicio), aŭ *nerektaj* (se ilin antaŭas unu prepozicio).

Rim. Oni ne konfuzu la tute ĝeneralan terminon *komplemento* kun la *suplemento*, kiu estas nur unu speco de la komplementoj akcesoraj.

La sekvanta tabelo sintezas la frazelementojn (en ĝi la mallongigo *d. de* signifas: *determinebla de*):

KARDINALAJ FRAZELEMENTOJ		KOMPLEMENTOJ		
Predikato d. de	} Subjekto d. de	Objektaj	Cirkonstancaj	Akcesoraj
		} Epiteto aŭ Suplemento
		Objekto d. de	
		Adjekto d. de		

26 Ekzistas frazoj, en kiuj la supraj karakteriziloj estas rilatigitaj al la subjekto pere de verbo, kies rolo estas nur precizigi la naturon de tiu rilato. Tiam verbon oni nomas *kopulo* (ekz-e: *esti, iĝi, ŝajni*) kaj la karakterizilojn, kiuj propre havas la funkcion de predikato, oni nomas per la komuna nomo *predikativo*.

La *predikativojn* oni povas distingi:

1. laŭ ilia vorta speco. Laŭ tio, ĉu ili estas adjektivo, substantivo ktp., oni parolas pri predikativo:

a d j e k t i v a: *ŝi estas bela;*

s u b s t a n t i v a: *li elektigis prezidanto;*

a d v e r b a: *kredeble estas, ke li venos;*

i n f i n i t i v a: *voli preskaŭ estas povi;*

p r e p o z i t i v a: *ambaŭ estas de la sama koloro.*

2. laŭ ilia rilat-elemento. La plej ofta okazo estas, kiam la predikativo rilatas al la subjekto:

s u b j e k t a predikativo: *la rozo estas velura.*

Sed oni renkontas ankaŭ okazojn, en kiuj la predikativo karakterizas tiom la agon, kiom la subjekton:

a d j e k t a predikativo: *ŝi dancas nuda.*

Fine, per aliaj verboj, oni povas rilatigi predikativon ankaŭ al objekto:

oni ricevas tiam objektan predikativon, kiu povas esti trispeca:

o b j e k t a predikativo adjektiva: *la amo faris min kruela^z;*

o b j e k t a predikativo substantiva: *oni elektis lin prezidanto;*

o b j e k t a predikativo infinitiva: *mi vidis la esperojn forfali en la abismon^z.*

3. laŭ ilia konstrumaniero: ili povas esti

a ŭ r e k t a j: *rigardi danĝeron ŝerco.*

a ŭ n e r e k t a j: *preni la danĝeron por ŝerco^z.*

27 Oni atentu por ne konfuzi la *specojn* kaj la *funkciojn* de la vortoj, t.e. la *parolelementojn* (difinitajn sub § 24) kun la *frazelementoj* (difinitaj sub § 25-26). Ekzemple la subjekto plej ofte estas substantivo, sed ĝi povas esti ankaŭ pronomo (*ĉiu* opinias), adverbo (*eĉ iom* estas tro), infinitivo (*voli* preskaŭ estas povi). La predikato estas preskaŭ ĉiam verbo, sed unuflanke ĝi povas konsisti el alia vorto, ekz. adverbo (*for* la neŭtralismom!) kaj aliflanke verbo povas funkcii kiel subjekto aŭ predikativo (vd. supre).

Ni konsilas atente legi la ĉi-suprajn difinojn, ĉar, celante plenan internaciecon kaj laŭeble konformiĝon al nia lingvo, ni devis fari distingojn kaj uzi terminojn, kiuj ne ĉiam havas respondaĵojn en la naci-lingvaj gramatikoj. Aliflanke, ni evitis kelkajn terminojn, kiuj ne havas la saman sencon en la diversaj lingvoj: ekz-e ni ne uzis la terminon *atributo*, ĉar germanoj komprenas ĝin epiteto kaj francoj predikativo. Cetere, en la gramatiko tiel same kiel en ĉiu alia scienca terminaro, oni povas atingi klarecon nur per ekzakta kaj logika difinado. Por pli komforta studo, ni aldonas du detalajn tabelojn.

I. Tabelo de la strukturaj frazelementoj

Frazelemento	Speco	Formo	Ekzemplo		
Predikato	aga-stata	ag- aŭ statverbo	La kato <i>manĝas</i> . La knabo <i>kuŝas</i> .		
	eca	kun "estas"	La domo <i>estas blanka</i>		
Subjekto	ĉiam samspeca	substantivo	} nominativa La kato <i>manĝas</i> .		
		pronomo		<i>Iu</i> venas.	
		infinitivo	<i>Promeni</i> estas agrable.		
		citajo	" <i>Kaptu</i> " estas u-moda.		
Objekto	rekta	akuzativo	La kato manĝas la <i>muson</i> .		
		infinitivo	Peĉjo lernas <i>legi</i> .		
	nerekta	prepozitivo	Li revas <i>pri feliĉo</i> . Mi donis <i>al ŝi</i> konsilon. Li prenis <i>de ŝi</i> la libron.		
Adjekto	rekta	adverbo	<i>Ŝi</i> kantas <i>bele</i> . Li venis <i>matene</i> . Li skribas <i>krajone</i> .		
		akuzativo	Li estis tombisto 30 <i>jarojn</i> .		
		infinitivo	Li iras <i>promeni</i> .		
	nerekta	prepozitivo	La muso estas <i>sub la lito</i> . Li venis <i>je la deka horo</i> . Li estis <i>en danĝero</i> . Li batas <i>per martelo</i> .		
Predikativo	de la subjekto	rekta	adjektivo	} nominativa La domo estas <i>blanka</i> .	
			substantivo		Li estas <i>kuracisto</i> .
			adverbo		Promeni estas <i>agrabla</i> .
			infinitivo		Voli estas <i>povi</i> .
	de la objekto	rekta	prepozitivo	Tio estas <i>de la sama speco</i> .	
			kun "kiel"	La urbo estas <i>kiel arbaro</i> .	
		nerekta	prepozitivo	Li trovis ĝin <i>laŭ sia gusto</i> .	
			kun "kiel"	Oni elektis lin <i>kiel kasiston</i> .	
	de la subjekto	rekta	adjektivo	} nominativa Li opiniis ŝin <i>pli juna</i> .	
			participo		Li trovis ĝin <i>velkinta</i> .
			substantivo		Oni elektis lin <i>kasisto</i> .
			infinitivo		Mi vidis lin <i>fali</i> .
de la objekto	nerekta	prepozitivo	Li trovis ĝin <i>laŭ sia gusto</i> .		
		kun "kiel"	Oni elektis lin <i>kiel kasiston</i> .		
adjekta		adjektivo	} nominativa <i>Ŝi</i> dancas <i>nuda</i> .		
		substantivo		Li mortis <i>mizerulo</i> .	

II. Tabelo de la akcesoraj komplementoj

Komplemento	Determinato	Formo	Ekzemplo
Epiteto	substantivo	adjektivo	la <i>blanka</i> domo; <i>fluganta</i> birdo.
		substantivo	mia amiko, <i>Karlo</i> ; la nomo <i>Karlo</i> .
	adjektivo	adverbo	<i>tre</i> utila; <i>iom</i> peza; <i>terure</i> malfacila.
	adverbo	adverbo	<i>tre</i> utile; <i>iom</i> peze; <i>terure</i> malfacile.
Suplemento	substantivo	prepozitivo	la domo <i>de la patro</i> ; krono <i>el floroj</i> ; kapablo <i>de parolo</i> ; libro <i>pri mastrumado</i> ; litro <i>da vino</i> ; skribo <i>de letero</i> .
		infinitivo	ordono <i>ataki</i> ; kapablo <i>paroli</i> .
	adjektivo	prepozitivo	preta <i>je ĉio</i> ; surda <i>al peto</i> .
		akuzativo	longa <i>tri metrojn</i> .
		infinitivo	inklina <i>akcepti</i> ; laca <i>paroli</i> .
	adverbo	prepozitivo	responde <i>al via letero</i> .
		akuzativo	spite <i>lian ordonon</i> .
infinitivo		nekapable <i>plenumi</i> .	
Suplement-epiteto	substantivo	adjektivo	<i>surstrata</i> vendejo.
	adjektivo	adverbo	<i>ĉiupaŝe</i> trovebla.
	adverbo	adverbo	<i>bastone</i> batite.

Rim. Legu jene: Epiteto de substantivo povas esti adjektivo aŭ substantivo ktp.

LA SUBSTANTIVO

Substantivojn oni distingas laŭ du kategorioj:

1. tiuj, kiuj servas por nomi klason, specon de uloj aŭ aĵoj, oni nomas la *komunaj nomoj*;

2. tiuj, kiuj laŭ socia konvencio servas por nomi individue ulon aŭ aĵon, estas la *propraj nomoj* (personaj kaj geografiaj).

La distingo inter la du klasoj ne estas ĉiam tre facila. *Vieno* estas ja propra nomo, tamen ekzistas almenaŭ du *Vienoj* en Eŭropo, dum ekzistas nur unu suno, kio tamen estas komuna nomo. Same, *Januaro* ktp., *Lundo* ktp. povas esti rigardataj kiel la propraj nomoj de tiu aŭ alia monato aŭ tago, sed oni povas rigardi ilin ankaŭ kiel simplajn tempo-dividojn, do kiel komunajn nomojn. Fine, la abstraktaj ideoj povas roli kiel komunaj aŭ kiel propraj nomoj, laŭ tio ĉu oni ilin personigas aŭ ne. Tio klarigas la hezitojn, kiujn oni rimarkos poste en la uzado de la propraj nomoj.

28

LA KOMUNAJ NOMOJ

La komunaj nomoj estas regule signitaj per la finaĵo -o. Por fari substantivon el ia ajn radiko, oni almetas al ĝi tiun finaĵon (kun eventuala sufikso).

Tiu finaĵo povas esti eliziata en poezio: tiam la substantivecon montras du signoj: 1. ke la radiko staras nuda — kaj el la variaj vortoj nur la substantivoj povas stari tiaj; 2. ke la akcento falas sur la lastan silabon — kaj tio estas la sola tia okazo:

De l' ter' al la ĉiel' ĝi laŭte kriasz.

(*ĉiel'* = *ĉielo*, ĉar akcentita sur la lasta; kp. *ĉiel*, adverbo, akcentita sur *ĉi-*).

Cetere en la skribo tiu elizio estas regule montrata per apostrofo.

Ekzistas tamen alispecaj vortoj, kiuj ludas la rolon de substantivo, ne alprenante la o-finaĵon; ili estas preskaŭ ĉiam (krom en proverboj aŭ similaj frazoj) akompanataj de determinilo, precipe de artiko, kiu donas al ili tian valoron. Oni trovas tiel uzatajn

jen adjektivojn: *mia kara*, *mia belo* / *estis brava juna danoz*; vd. § 74. jen pronomon: *ĉiu "li" havas sian "ŝi"z*; vd. § 48, 154.

29

30

jen nevariajn vortojn: *ĉiu morgaŭ havas sian zorgon^z; pledi la "por" kaj la "kontraŭ"^z; kiu ne atentis la "se", tiu sentas la "ve"^z;*

jen eĉ tutajn prop-ojn: *pli bona estas malgranda "jen prenu" ol granda "morgaŭ venu"^z.*

Fine havas veran valoron de substantivo, sen la o-finaĵo, la kvantaj adverboj *iom, neniom, kelke da, multe da, malmulte da: sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj^z* (la Z-a interkrampo klare montras tion valoron); *mi volus iom da teo* (kp: *tason da teo*); *ni havis jam neniom da mono.*

- 31 La substantivoj havas du diversajn valorojn, laŭ tio, ĉu ili prezentas ideon pri *afo* (estaĵo, konkretaĵo aŭ abstraktaĵo) aŭ pri *ado* (stato, ago): tiuj valoroj multe influas ilian uzadon, proprecojn kaj konstruojn kaj tial ni devas studi aparte la aĵ-substantivojn kaj la ad-substantivojn.

A. — La aĵ-substantivoj

- 32 Ilin oni devas studi laŭ la vidpunkto de la genro, de la nombro kaj de la kazo.

Genro

A. - Gramatika genro ne ekzistas en Esp-o.

Ĉe la komunaj personnomoj la vira sekso estas nur negative montrata: ke *patro* difinas viron, tion ni scias nur, ĉar forestas signo de ineco; oni povas diri, ke la virsekso montras *signo nula*.

Rim. Tiu sistemo de negativa esprimado de virsekso estas tiel ĝenerala, ke mankas en Esp-o eĉ speciala vorto por signi la mal-inecon. Post multaj hezitoj, oni ekuzis prefikse la radikon *vir* por tiu signifo: *vir^zkato kaj katino estas gekatoj*. (Ĉe Z. oni trovas ankoraŭ *ĉevalviro, bovoviro*). Sed ĉar *vir* havas du aliajn signifojn (virhomo kaj maturiĝinta homo), oni bezonus specialan radikon por esprimi la mal-inecon; kelkaj proponis "masklo". Krome, pri kelkaj bestospecoj, oni bezonus apartan radikon por la virbesto, pro la ekzisto de mitologiaj duonhomaj kreaĵoj; jam oni uzas *taŭro* (P.I.V.) anstataŭ virbovo (kiu povus signifi: minotaŭro); oni plue proponis *boko* (Christaller) anstataŭ virkapro (kiu povus signifi: faŭno) kaj *stalono* anstataŭ virĉevalo (centaŭro). Vd. § 364.

Ankaŭ la ina sekso estas negative montrata ĉe la vortoj, kiuj esprimas estmanieron specialan al inoj, kaj por kiuj ne ekzistas vira ekvivalento: *matrono, amazono, primadono, meretrico**, *gorgono, nimfo, furio*. Vd. § 333.

Ĉe la aliaj vortoj, ĝi estas montrata per la sufikso *-in* aŭ (kun karesa nuanco) per *-nj*: *katino, panjo*.

B. - Pri la uzaĉo de la genrokaraktiziloj oni rimarku ankoraŭ:

1. Ili povas stari nur en vortoj, kiuj montras seksulojn. Vd. tamen § 339, noto.

2. Sed la vir-formo estas tre malofte uzata, kaj nur pri bestoj, kiam oni nepre bezonas precizon: *el ĉiuj brutoj prenu po sep paroj, virbestojn kaj iliajn inojn^z!* Anstataŭ ĝi, oni uzas ordinare la simplan formon:

al feliĉulo eĉ koko (= virkoko) donas ovojn^z; sur la korto staras koko kun tri kokinoj^z; tiu estas la sole uzata por homoj: mi konas tiun anglon (ne: vir-anglon!); li estas prezidanto de la komitato.

3. Male, la in-formo estas regule uzata, tiel pri homoj, kiel pri bestoj: *mi havas bovon kaj bovinon^z; la juna vidvino fariĝis denove fianĉino^z; ŝi estis elektita sekretariino de la grupo.* Oni eĉ esprimas ĝin plurfoje pri sama persono: *mia fratino estas tre bela knabino^z (ne skribu do: mi parolis kun knabina amiko!).*

4. Tamen oni uzas la simplan formon, se temas indiferece pri viroj aŭ inoj: *ĉiu homo (virhomo tiel same kiel homino) amas sin mem^z; en la ligo la virinoj povas fariĝi oficistoj egale kiel la viroj.*

Nombroj

A. - Gramatikaj nombroj ekzistas du: *singularo*, uzata kiam temas nur pri unu afero, kaj *pluralo*, uzata kiam temas pri pli ol unu afero.

La singularo estas nur negative montrata per signo nula: *patro* difinas unu viron, ĉar mankas signo de pluralo.

La pluralo estas montrata jen per finaĵo -j: *patroj kaj filoj*; jen, en apartaj okazoj, per afiksoj: oni tiucele uzas aŭ la prefikson *ge-*, se temas pri adicio de personoj el ambaŭ seksoj: *la gesinjoroj N^z, gefratoj X*; aŭ la sufiksoidon -ar, se temas pri adicio de samspecaj aferoj konsistigantaj kolektivajon: *arbaro* (= samloke kreskantaj arboj), *homaro* (= la homoj).

Probable pro nacilingva kutimo, la plurala prefikso *ge-* postulas tamen pleonasme la pluralan finaĵon -j: *sinjoro Adam + sinjorino Adam = gesinjoroj Adam* (Kp. germane: *Geschwister*, ĉiam plurala). Tiel, kiam oni parolas pri la gefratoj X, oni ne povas scii, ĉu temas pri frato kaj fratino aŭ pri fratoj kaj fratinoj.

Male la sufikso -ar ne postulas la pluralan -j: (kolektitaj) arboj = *arbaro*.

La plurala signifo de -ar klarigas, kial, en kelkaj lokoj, vorto difinante forme singularan ar-vorton, tamen staras plurale: *via idaro estos fremduloj en lando, kiu ne apartenas al ili^z.*

Rim. Analogie, ĉe kelkaj vortoj, kiuj entenas ideon pri kolektivo, la pluralo estas kelkfoje negative montrata: *la popolo malpacis kontraŭ Moseo, kaj ili diris^z; da bruto granda kaj malgranda mi havis pli multe ol ĉiu^z.*

B. - U z a d o — El la vidpunkto de la nombro la aĵ-substantivoj varias laŭ tio, ĉu ili prezentas unu aŭ plurajn aferojn.

1) Tamen oni uzas singularon post pli ol unu, se ties senco estas emfaza: *ne nur unu.* Ekz-e: *tiun esprimon oni trovas ĉe pli ol unu aŭtoro (= ĉe pli multaj aŭtoroj ol unu aŭtoro).* Sen emfaza senco, Z. uzas pluralon kaj dividstrekojn: *la plej bona maniero estus, se ni al pli-ol-unu personoj dirus vi^z.* Sed tiaokaze oni nun uzas: *pluraj.* Oni eĉ trovas ĉe li la kuri-ozan: *posedantino de pli ol unu da fiŝujoj.* Kp. § 178. Rim. II. Post

malpli ol du oni uzas pluralon: *en malpli ol du horoj mi revenos.*

2) Oni uzas la pluralon por montri unu objekton konsistantan el pluraj partoj: *la okulvitroj^z* (kp: *nazumo*); *la analoj* (kp: *kroniko*); sed, male al pluraj lingvoj, *pantalono*, singulare.

3) Kiam temas pri pluro da aferoj pounu posedataj de pluraj personoj, oni uzas la singularon: *la laboristinoj levis la kapon^z* (ne: *kapojn*); *la tajpistinoj komencis vigle taŭzi sian maŝinon* (ne: *maŝinojn*); *dek du junulinoj, tenante en la mano oran tulipon^z* (ne *manoj*, *orajn tulipojn*). Se konfuzo povus estiĝi, ĉu ekzistas unu komuna posedaĵo aŭ pluraj individuaj, oni evitu ĝin per enmetado de la pronomo ĉiu: *tiuj riveretoj havas ĉiu sian fonton en la altebenaĵo.*

C. – Aparta fako en la kategorio de la nombro estas la esprimado de la kolektiveco.

En Esp-o ĝi estas esprimita:

1) per la kolektivaj afiksoj ge kaj ar: *mi gratulis telegrafe la junajn gedzojn^z*; *nia militistaro estas brava^z.*

2) per la pluralo: *niaj militistoj brave batalis.*

3) per la singularo ĉe vortoj esprimantaj per si mem kolektivon: *popolo, gento, nacio, lando, grego, armeo, bando, trupo* ktp.; escepte, ĉe malmulte da aliaj vortoj, en la altatonaj religiaj tekstoj: *ĉiu karno malvirtigis sian vojon sur la tero^z*; *ni kreu homon kaj ili regu super la fiŝoj kaj la birdoj^z*; aŭ en la poezio: *malsata stomako orelon ne havas^z*; *piedetojn okulo ekvidi ne povis* (Grabowski); *kaj okulojn ĉiujn larm' sincera banis* (Kalocsay); *kaj muĝis ond' en arboakompan'* (T. Pumpr).

Sed estas nekorekta la uzado de singularo ĉe frazoj kiel: *la soldato sekvis Cezaron kun blinda fido* (= *soldatoj*).

Rim. Oni ne devas konfuzi tiun okazon kun tiu, ĉe kiu oni konsideras vorton laŭ ĝia esenca signifo: *la homo estas racia animalo*; *la franco estas rezonama*; *hodiaŭ la situacio de la ĵurnalisto estas ankoraŭ akceptebla, tiu de la verkisto tre malbona*; tiam la singularo estas tute regula. Oni povas do diri, ke la singularo estas ĝusta, kiam temas pri ĝenerala reprezentanto de klaso, kategorio, raso, gento, speco.

Kazoj

34

K a z o j ekzistas tri: *nominativo*, kiu signas, ke la vorto funkcias kiel subjekto aŭ predikativo; *akuzativo*, kiu signas, ke la vorto funkcias kiel rekta objekto aŭ adjekto; *prepozitivo*, t.e. substantivo antaŭata de prepozicio, kiu signas, ke la vorto funkcias kiel nereкта objekto aŭ adjekto.

Rim. I. En la Fundamenta Gramatiko Z. diras: "Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo... La ceteraj kazoj estas esprimitaj per helpo de prepozicio..." Por pli granda oportuno, ni proponas tie ĉi la nomon "prepozitivo" por ĉiuj tiuj aliaj kazoj, cetere pli multaj ol la tri aluditaj en la Fundamento.

Propre oni povus distingi tiom da kazoj, kiom da prepozicioj ekzistas en la lingvo: *genitivo* (de), *dativo* (al), *instrumentalo* (per), *elativo* (el), *terminativo* (ĝis), *sociativo* (kun), *komitativo* (kune kun), *privativo* (sen), *kaŭzalo* (pro), *finalo* (por) ktp. Sed tio estus nur balasto. Pli simple estas paroli pri de-prepozitivo,

al-prepozitivo, per-prepozitivo ktp.

Nur ĉe la tabel-pronomoj ni parolas pri *genitivo*, ĉar ĉe ili tiu kazo estas esprimata ne per prepozitivo, sed per speciala finaĵo (kies).

La *nominativo* estas nur negative montrata, per signo nula: *patro* estas nominativa, ĉar mankas signo de alia kazo.

La *akuzativo* estas montrata per la finaĵo -n, kiu almetiĝas tiel al la plurala, kiel al la singulara formo: *patro-n, patroj-n*.

La *prepozitivo* estas montrata per unu el la prepozicioj metita antaŭ la vorto: *de la patro, al la patro, ĉe la patro, pri la patro, sen la patro* ktp. Ni signos ĝin per la prepozicio *je*, simbolo de ĉiuj uzeblaj. Same kiel la akuzativa -n almetiĝas al la nominativa formo, tiel ankaŭ la prepozitiva prepozicio principe almetiĝas al la nominativa formo. Tamen, en kelkaj okazoj, oni por difinita signifo almetas kune al la substantivo la prepozicion antaŭe kaj la n-finaĵon poste, sintezante tiel ian "akuzativprepozitivan" (vd. § 121).

Rim. II. El la supraj difinoj oni vidas, ke la finaĵo -o estas sinteza kompleksaĵo, kaj entenas kvar signifojn: 1) substantivecon; 2) (ĉe personaj nomoj) virsekson; 3) singularon; 4) nominativon.

B. — La ad-substantivoj

Ili kompreneble ne havas sekson.

Ili ankaŭ ne devus varii *plurale*, ĉar la pluraleco t.e. la ripeteco de ago regule esprimiĝas per la afiksoj ad kaj re (§ 320; 361). Tamen ilin oni uzas plurale en du okazoj:

1) Ĉe pluraj vortoj la distingo inter la propredirita ago kaj la rezulto de tiu ago estas malfacila, kelkfoje neebla: *krio* estas tiom la ago *krii*, kiom la rezultanta sono; *paŝo* estas tiom la ago *paŝi*, kiom la traŝita spaco; kaj la signifo de rezulto ne estas sufiĉe malproksima de la signifo de ago por ebligi la uzon de la sufiksoido aĵ. Tiam oni povas uzi la pluralan formon, kiu distingiĝas de la ad-formo nur per tiu nuanco, ke oni insistas pri la malkontinueco de la agado: *la unuaj esp-istoj pacience elmetadis sin ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj^z* (oni povus preskaŭ samsence diri: *al konstantaj mokoĵ — al granda ofero*).

2) Eĉ kiam la signifo de ago estas klare montrata de la sufiksoido ad, oni povas uzi la pluralon por signi, ke pluraj agantoj aparte plenumas paralelajn agojn: *la konkurencaĵoj armadoj de la koncernaj regnoj; la saltadoj, turniĝadoj kaj svingiĝadoj de tiuj derviŝoj estis mirigaj*.

Pri la kazo validas la samo, kiel ĉe la aĵ-substantivoj.

LA PROPRAJ NOMOJ

La propraj nomoj estigas du gravajn demandojn: unue pri ilia loko en la lingvo, due pri ilia aparta gramatika karaktero.

Se oni legas ekzemple la frazon: *la antaŭa linio kunigis Villacoublay al*

35

36

Istanbul tra Brno kaj Rákosszentmihály, oni havas la impreson, ke al pure Esp-aj vortoj miksiĝis aliaj, tute ne asimileblaj, alilingvaj elementoj. Oni do povas diri, ke principe la propraj nomoj estas rigardataj kiel "fremdaj", nur la komunaj apartenas al la mekanismo de la lingvo.

Asimilitaj nomoj

Tamen, ĉar pluraj el tiuj nomoj estas tiel konataj, ke ili ŝajnas aparteni ne plu al unu nacio, sed al la tuta homaro, oni provis doni al tiu komuna heredaĵo ankaŭ Esp-an formon, t.e. ilin *asimili*. Tiu asimilo montriĝas per tri karakteroj: 1. transskribo per Esp-aj literoj; 2. alprenado de la Esp-a akcento; 3. alprenado de gramatika finaĵo. Sed oni devas rimarki, ke la personaj nomoj multe pli kontraŭstaras tian asimiliĝon, ol la geografiaj nomoj, kiuj kelkfoje akceptas eĉ profundan modifon de la radiko mem, por celi al pli granda internacieco (kp. *Lisbono* kun *Lisbōa* kaj *Lisabona*, *Varsovio* kun *Warszawa*, *Kopenhago* kun *København* ktp.).

Praktike, el la *geografiaj* nomoj estas asimilitaj la plej konataj kaj ofte uzataj:

1) ĉiuj nomoj de kontinentoj, gravaj insuloj kaj maroj: *Afriko*, *Ameriko*, *Azio*, *Eŭropo*, *Oceanio*, *Aŭstralio*; *Korsiko*, *Sicilio*, *Malto*, *Kreto*, *Hebridoj*, *Novlando*, *Antiloj* (*Martiniko*, *Gvadelupo*), *Kanarioj*, *Sankt-Helena*, *Madagaskaro*, *Cejlono*, *Borneo*, *Javo*, *Nov-Zelando*, *Tahitio* ktp.; *Atlantiko*, *Pacifiko*, *Hinda Oceano*, *Mediteraneo*, *Maro Nigra*, *Maro Ruĝa*, *Maro Blanka* ktp.

2) ĉiuj nomoj de landoj: vd. § 337, 3.

3) kelkaj nomoj de lagoj, riveroj kaj montoj: *Ĝeneva* (aŭ *Lemana*), *Lago*, *Lago Maĵora*, *Lago de Komo*, *de Gardo*; *Danubo*, *Rejno*, *Vistulo*, *Dnepro*, *Amuro*, *Jeniseo*, *Misisipo*, *Amazono*; *Monto Blanka*, *Kaukazo*, *Apeninoj*, *Alpoj* ktp.

4) kelkaj nomoj de urboj, precipe la plej gravaj (ĉefurboj) aŭ rimarkindaj el Esp-a vidpunkto (sidejo de kongreso ktp.): *Antverpeno*, *Barcelono*, *Berno*, *Bjalistoko*, *Budapeŝto*, *Bulonjo* (-ĉe-maro), *Ĉikago*, *Dancigo*, *Dresdeno*, *Edinburgo*, *Ĝenevo*, *Ĝenovo*, *Hago*, *Helsinko*, *Jokohamo*, *Kembriĝo*, *Konstantinopolo*, *Kopenhago*, *Krakovo*, *Lisbono*, *Londono*, *Madrido*, *Napolo*, *Novjorko*, *Numbergo*, *Oksfordo*, *Parizo*, *Prago*, *Romo*, *Stokholmo*, *Varsovio*, *Vaŝingtono*, *Vieno*, *Venecio* ktp.

Sed la granda plimulto el la kategorioj 3. kaj 4. restas plene neasimilita: *Lac de Neuchâtel*, *Bodensee*, *Ems-rivero*, *Somme*, *Appenzell-montoj*; *Lille*, *Łódz*, *Weimar*, *Dover*, *Miskolc*, *Tallinn* ktp.

Rim. I. Precipe utila estus la starigo, kaj ankaŭ la oficialigo fare de la Akademio, de Esp-aj nomoj por la montoj aŭ urboj, kiuj limas al pluraj diversaj lingvodistriktoj, kaj sekve havas plurajn, konfuz-estigajn nomojn: ekz-e la montaro nomata ĉefe *Krkonoŝe* kaj germane *Riesengebirge*, kiun oni prefere nomu unuece per *Giganta Montaro*.

El la *personaj* nomoj estas ordinare asimilitaj: 1. la antaŭnomoj (bapto-

nomoj); 2. la plej famaj propraj nomoj latinaj, helenaj, hebreaj kaj orientlingvaj.

La *viraj* antaŭnomoj kaj ĉi-supre difinitaj nomoj ricevas la finaĵon *-o* de la substantivo: *Jakobo, Paŭlo, Alberto, Ludoviko, Valentino, Georgo, Johano, Petro, Klaŭdo, Mateo, Luko*, ktp.; *Cicerono, Horacio, Virgilo* (ankaŭ *Vergilio*), *Odiseo* (ankaŭ *Uliso*), *Prometeo, Aristotelo, Temistoklo, Periklo, Eŭripido, Konfuceo* ktp.

Rim. II. Ni ne povas tie ĉi detale okupiĝi pri la transskribo de la grekaj kaj latinaj propraj nomoj: tio estas la tasko de vortaro. Sistemon pri ĝi starigis E. Wüster en sia Enciklopedia Vortaro (pĝ. 46-51) kaj iom modifis G. Waringhien, en sia *Esp-franca Vortaro* (pĝ. 10, 12).

La *virinaj* nomoj estas principe same traktataj, kiel la *viraj*: *Ifigenio^z, Ofelio^z, Lukrecio^z* ktp., aŭ formataj el la responda vira antaŭnomo per la sufikso *-in*: *Paŭlino, Juliino, Ludovikino, Johanino* ktp.

Sed tiu solvo estas iom maloportuna, ĉar ofte ĝi ne permesas distingi la *virinajn* nomojn disde la *viraj* (*Lukrecio* povas respondi same al *Lucretius*, kiel al *Lucretia*) aŭ ĝi kondukas al monstraj formoj kiel *Mariino, Aŭgustenino, Martenino* ktp. Tial pli kaj pli oni kutimiĝis aŭ tute ne asimili la *virinajn* nomojn (*Z*-aj formoj: *Rahel, Jezabel, Judit, Elizabet* ktp.), aŭ almeti al ili la *a*-finaĵon de la substantive uzataj adjektivoj (vd. § 74): *Lukrecia, Ifigenia, Andromaka, Paŭla, Johana* ktp. Ofte ambaŭ rimedoj koincidas, ĉar en multaj lingvoj la *virinaj* nomoj finiĝas per *-a*: *Eva, Sara, Marta, Delila, Lia, Suzana* (*Z*-aj formoj); *Kleopatra, Diana, Maria, Naŭzikaa, Minerva, Margarita*, ktp. Detalan liston de *virinaj* antaŭnomoj vidu sub § 333.

Rim. III. Kompreneble apartenas al la lingvo ankaŭ la nomoj de personigitaj abstraktaĵoj: *la Forto mistera de l' mondo nin benos^z*. Kiam, pro nacilingva influo, oni atribuas al ili sekson, tiu sekso estas negative montrata; nur la rilatantaj pronomoj aŭ epitetoj ĝin malkovras: *per kio vi kolerigis la Fortunon, ke ŝi vin sendis tien ĉi?^z; Vi, Plenumiĝ', filino plej ravanta!^z*

Neasimilitaj nomoj

La *neasimilitaj* propraj nomoj povas stari sub du formoj:

1) aŭ ili estas fonetike transskribitaj laŭ la *Esp-a* alfabeto, sed alprenas nek la *Esp-an* akcenton, nek la gramatikan finaĵon; tia "duon-asimilo" estas la regulo por ĉiuj *neasimilitaj* nomoj el la antikvaj lingvoj, kaj el tiuj modernaj lingvoj, kiuj ne uzas latinan alfabeton: *Jahveh, Noemi, Jiftaĥ, Gilead, Goljat, Zeus, Aristippos, Titus Livius, Via Appia, Puŝkin, Tolstoj, Valmiki, Himalaja, Meng-cu, Niŝimura, Fujijama*. Oni trovas tamen plene *neasimilitajn* latinajn nomojn: *Porta Capena, Chaereas, Philipp^z* ktp.

2) aŭ ili konservas siajn naciajn formojn kaj alfabeton: tia estas la regulo por ĉiuj *neasimilitaj* nomoj el la latin-alfabetaj lingvoj: *Byron, Shakespeare, Goethe, Rabelais, Montaigne, Alighieri, Bordeaux, Versailles, Kehl, Durazzo* ktp.

En tiu lasta okazo estas rekomendate aldoni interkrampe aŭ piednote la proksimuman Esp-an prononcon.

Propoj de solvo

38

En la du antaŭaj paragrafoj ni priskribis la nunan staton de la problemoj pri la propraj nomoj, kaj oni facile povis konstati, ke ĝi ne estas vere solvita. Nur tendencojn kaj kutimojn ni indikis, ne logikan regulon. Efektive la demando estas plej malfacila, precipe por la nomoj apartenantaj al la lingvoj, kiuj uzas la saman alfabeton, kiel Esp-o: ĉar ilia ortografio preskaŭ neniam koincidas kun ilia prononco, laŭ la postuloj de la Esp-a alfabeto. La logikemaj spiritoj povas do elekti inter du vojoj: aŭ trudi al ĉiuj propraj nomoj la Esp-an ortografion, foroferante ilian internacian skribon, kaj konservante el ilia sonkonsisto nur tiujn sonojn, kiuj ekzistas en Esp-o; aŭ respekti la internacian skribon kaj prononci ĝin laŭ la reguloj de la Esp-a aboco, foroferante ilian originan kaj pli-malpli ĝeneralan prononcon.

La unua tendenco montriĝis ekde la unuaj jaroj de la Esp-a literaturo per la duon-asimilo de anglaj, germanaj ktp. nomoj. En 1890 Z. skribis: "La logiko kategorie ordonas, ke por ĉiuj nomoj estu enkondukita unu egala ortografio... Sendube tio ĉi poste estos enkondukita, kaj post kelkaj jaroj la skribado "Byron" anst. "Bajron", aŭ "Goethe" anst. "Gete" kredeble estos rigardata kiel eraro". (La Esp-isto, n-ro 29). En 1894, li, sur la kovrilo de sia traduko de Hamleto, ortografiis: "V. Ŝekspir". Tiun sintenon de Z., kontrastan kun lia kutima sento pri modereco kaj ĝusta mezo, oni povas klarigi per tio, ke li mem kaj multaj el la unuaj esp-istoj apartenis al slavaj lingvoj, ĉe kiuj la ekzisto de aparta alfabeto trudas sisteman uzon de fonetika transskribado. Sed baldaŭ li konsciis, ke malfacile tiu sistema solvo povus esti ĝeneraligata, kaj li revenis al la okcidentlingvaj kutimoj, konservante al la latinalfabetaj nomoj ilian fremdan aspekton: *Shakespeare* (eldono 1901 de Hamleto), *Goethe* (traduko de Ifigenio), *Orzeszko* (traduko de Marta) ktp. Tamen tiu solvo ne estis tute forlasita, kaj post la milito ĝin realprenis la laborista literaturo, kiu sisteme internaciigis la proprajn nomojn: *Kandid de Volter*; *La brava soldato Svejk* de *Hašek*. Tiun klopodon oni ne povas principe malaprobi, ĉar ĝi celas pli grandan oportunecon kaj internaciecon, sed oni devas konfesi, ke ĝi ofte malhelpas la rekonon de la nomoj. Unu sola ekzemplo: la bedaŭrata prof. E. Bokarev, en parolado reproduktita en la germana "der esperantist" (Okt. 67), citis frazon de "la fama franca lingvisto Antoin Mayette". Kiu okcident-eŭropano rekonas la nomon de Antoin Meillet tiel misformitan tra la rusa, laŭdire fonetika transskribo (la ĝusta estus: antŭan' meje')?

La duan solvon proponis en 1935 s-ro Rollet de Lisle, prezidanto de la tiama Lingva Komitato; en broŝuro dediĉita al tiu temo, li klarigas, ke ĉe la okcidentlingvaj propraj nomoj gravas nur la internacia ortografio; oni do devas ĝin nepre konservi. Sed kiel prononci? Se temas pri samlandanoj inter si parolantaj, ili kompreneble prononcu kiel en sia hejma lingvo; sed se temas pri alilingvanoj, tiuj prononcu laŭ la Esperanta alfabeto, aŭ pli ĝuste ili silabumu laŭ la Esperanta aboco (kun kelkaj konvencioj: th prononcota kiel t+h, x kiel ks, y kiel i ktp.): *Go-e-t-he*, *Ra-be-la-is*, *Bor-de-a-u-ks* ktp. Tiu heroa solvo ŝajnas tiel malmulte bonŝanca, kiel la unua, kaj pro la sama motivo: troa logikeco, kiu kondukas al ekscesa misforma-

do aŭ de la skribo aŭ de la prononco. Al kaosa situacio povas konveni nur mal-absolutaj reguloj, kaj tiel kvazaŭ praviĝas la nuna lingva stato.

Majuskla skribo

La propraj nomoj gramatike sin distingas per du eksteraj karakteroj: 1. ili komenciĝas per majusklo; 2. ili principe ne toleras antaŭ si artikolon. Tiun duan karakteron ni studos poste, en la ĉapitro pri la artikolo (vd. § 77).

Komenca majusklo signas do principe propran nomon; sed ĉar tiu signo vekas atenton, draste akcentas la vorton, kaj klare apartigas la koncernan ideon disde ĉiuj similaj, oni pli kaj pli emis uzi ĝin ĉe nomoj, kiujn oni rigardas analogaj al la propraj. En la nuna uzado, oni skribas kun majusklo:

1) la personajn proprajn nomojn: *Petro, Napoleono, Goethe, Romain Rolland.*

2) la personigitajn ideojn: *nun staras antaŭ miaj animaj okuloj nur tiu alta morala Forto...^z.*

3) la nomojn de kontinento, lando, provinco, urbo, monto, maro, rivero, festo: *Azio, Hungarlando, Kanado, Brabanto, Loiret, Roma, Moskvo, Alpoj, Rejno, Pasko* ktp.

Rim. I. Kiam tiuj nomoj konsistas el adjektivo kaj substantivo, ambaŭ akceptas komencan majusklon: *la Paca Oceano^z, la Maro Nigra, la Monto Blanka, la Granda Fasto* ktp.

4) la titolojn de socia funkcio, kiam ili antaŭas personnomon: *Doktoro Zamenhof, Profesoro Grosjean-Maupin*, aŭ estas uzataj kiel alvoko: *mi petas, Via Moŝto!*

5) la nomojn kaj apudnomojn de dioj kaj diinoj: *Dio, Allah, la Eternulo, la Savinto, la Krucumito, Diana, la Sankta Virgulino, la Nemakulita*. En kelkaj piemaj rondoj, oni eĉ majuskligas la pronomojn kaj posedajn adjektivojn rilatajn al Dio: *kŭ premas malriĉulon, tiu ofendas lian Kreinton, kaj kiu Lin honoras, tiu kompatas malriĉulon^z.*

6) la titolojn de societo, libro, kanto, dokumento ktp.: *UEA, AELA, la Ligo de Nacioj, la Biblio, Enciklopedio de Esperanto, Plena Ilustrita Vortaro; la unua kunveno estas dediĉita al la "Deklaracio"^z; la Marselejo^z.*

Pri kelkaj aliaj vortspecoj regas ankoraŭ plena senordo:

a) El la nomoj de la tempodividoj Zamenhof majuskligis nur la monatomojn (Junio, Decembro ktp.), sed ne la nomojn de sezono (somero, vintro ktp.) nek de tago (lundo, dimanĉo). Lia uzado cetere ne estis ĉiam konstanta. Ŝajnus pli simple kaj logike skribi per minusklo ĉiujn tiujn vortojn, krom, kompreneble, kiam ili estas personigitaj, kiel ekz-e la Vintro en unu Andersen-fabelo.

b) la popolnomoj per si mem neniel estas propraj nomoj: esti franco, ruso ktp. ne estas pli individuiga eco, ol esti longkraniulo, avarulo aŭ ftizulo. Sed tial ke la popolnomoj estas en strikta rilato kun la landno-

moj, kiuj ja estas propraj, ĉar personigaj, oni plurfoje atribuis la majusklecon ankaŭ al ili. En siaj verkoj ĝis Marta (1911) Zamenhof skribis: *hebreatoj, francoj, rusoj* (Ekzercaro), *angloj, usonanoj* (Paroladoj), *la francino* (Marta) ktp. Sed en liaj postmortaj verkoj oni trovas aplikita la anglan skribmanieron, kiu atribuas majusklon al la landnomoj kaj al ĉiuj ties derivaĵoj: *vera Dano; Hungara kavaliro; Turko* (Andersen-fabeloj); *Filiŝtoj, Ĥaldeo* (Biblio). Ĉu tiu skribmaniero estis efektive la lia, aŭ ĉu oni ĝin pruntis al li, oni rajtas heziti. Kaj malgraŭ tiuj lastaj ekzemploj, estas rekomendinde skribi per minusklo ĉiujn popolnomojn.

Rim. I. Mi konfesas, ke, kun paso de la tempo, mi fariĝis pli favora al la majusklo de la popolnomoj, kaj al tiu de la derivitaj adjektivoj de la propraj nomoj. Nekontesteble, tio evitigas dubojn, kiam temas pri ne tre konataj nomoj, aŭ ĉe nomoj homonimaj al komunuzaj radikoj: oni tiel pli facile identigas *Ĉinuko, Huno, Kazaĥo, Lakono, Seminolo* kiel proprajn nomojn, kaj ne riskas konfuzi *Ligo* kun *ligo, Medo* kun *medo, Partoj* kun *partoj, Tirano* kun *tirano* ktp. (G.W.)

Rim. II. La majusklo restas ĉe la senpere derivitaj adjektivoj kaj adverboj: *la Pariza grupo*; *vian Herostratan laboradon*, tiel ebliganta distingon de *priama letero* disde *Priama petego, kuba radiko* disde *Kuba ĉapelo, senegala amatino* disde *Senegala virino, kanaria kanto* disde *Kanaria korespondanto, malta faruno* disde *Malta vino, kreta klifo* disde *Kreta promontoro, Romana politiko* disde *romana intrigo* ktp. Tamen, kiam la adjektiva formo akiris metaforan signifon kaj tiel fariĝis kvazaŭ komunsenca, oni tendencas skribi ĝin per minusklo, kaj konservi la majusklon por la propra uzado: *unu herakla laboro* (=tre malfacila); *unu Herakla laboro* (=de Heraklo mem).

Rim. III. "Esperanto" estis origine personnomo (Dro Esperanto), kaj tial ĝi konservis la majusklon en sia substantiva formo kaj en la finaj derivaĵoj: *libro tradukita en Esp-o; Esperante paroli; Esperanta traduko*. Sed oni skribas minuskle la sufiksajn derivaĵojn: *esperantisto, esperantismo, esperantigi* ktp. Sed "*Esperantujo*" kaj "*La Esperantisto*" (vd. ĉi-supre 3 kaj 6).

Deklinacio

40

Kiel la komunaj, la propraj nomoj deklinaciĝas laŭ nominativo, akuzativo kaj prepozitivo. Por la akuzativo, oni uzas simple -n, kiam ili finiĝas per prononcata vokalo: *Elišan*^z, *Dante-n*, *Hugo-n*, *Bordeaux-n*, *Athenaj-n*. Oni uzas -on, kiam ili finiĝas per prononcata konsonanto: *Shakespeare-on*, *Lajpcigon*, *Lebanonon*^z. Tamen Z. plej ofte evitis la akuzativan finaĵon ĉe neasimilita nomo, kaj por tio -li simple antaŭmetis deklinacieblan vorton: *s-ron Boirac*^z.

Ili ne havas pluralon, krom en du okazoj: 1) se ili signas aron da malfacile distingeblaj aŭ nekutime distingataj individuajoj, kiuj povas esti konsiderataj kiel unu tuto: *Alpoj, Apeninoj, Andoj, Karpatoj* (montaro); *Antiloj, Hebridoj, Kanarioj* (insularo); *la Burbonoj, Hohencolernoj, Karolidoj* (familio). Pli logika, sed pli peza estus la esprimo: *Alpa montaro, Kanaria insularo, Burbona familio* ktp.; 2) se ili signas ne la difinitan personon mem, sed individuojn al ĝi similajn: *Homeroj aŭ Pindaroj*

ne povus vivi en nia mekanika civilizacio; unu Mecenato povas estigi plurajn Vergiliojn.

Rim. En tiu ĉi lasta funkcio, la propraj nomoj tiel proksimiĝas al la komunaj, ke ili facile konfuziĝas kun ili: *la foiraj herkuloj; li estis mia mentoro; estis sozio de la princo.* En tiaj okazoj, kiam la vorto ne elvokas plu ideon pri unika individuo (Herkulo, Mentoro, Sozio ktp.), oni skribas ĝin per komenca minusklo. Vd. § 39. Rim. II.

LA PRONOMO

- 41 La vortoj, kiujn oni klasas sub la kolektiva nomo *pronomoj*, ne havas ĉiuj la saman karakteron. Unuj anstataŭas substantivon aŭ ideon, kiuj ĝenerale estis antaŭe esprimitaj: "Paŭlo falis, kaj *li* ploras. El viaj libroj, *kiu* estas la plej interesa? — *Tiu ĉi*. Li alvenis! — Mi jam *tion* scias". Oni povas nomi ilin *reprezentantoj*, kaj la substantivon, kiun ili anstataŭas, *reprezentato*.

Aliaj anstataŭas nenian substantivon aŭ ideon; ili montras personon aŭ aferon, kiun oni ne aludas apude; ili estas "absolute" uzataj, kaj oni povas nomi ilin *kvazaŭnomoj*; "*mi* iros; ĉu *vi* venas? *oni* silentis; *nenio* mankas; *iŭ* kriis".

Rim. La okazo ne estas la sama kiel ĉe la vortoj aluditaj en § 30. Ĉe ili, la substantiveca uzado estis escepta; ĉe la kvazaŭnomoj, ĝi estas regula, kaj eĉ fundamenta.

Fine, pluraj povas rilati al substantivo kaj ĝin determini; tiuj estas la *determinantoj* aŭ *pronomaĵoj*: *kiu homo? mia patro; iun tagon*.

Sama pronomo povas ludi ĉiujn tri rolojn: la pronomo estas reprezentanto en "infano, *kiu* ridas, estas ĉarma"; — kvazaŭnomo, en: "plej bone ridas, *kiu* laste ridas"; — determinanto en: "*kiu* hundo bojas, tiu ne mordas".

En la *determina* funkcio la pronomoj havas tute la karakteron de adjektivo; tial ni pritraktos ilin sub la ĉapitro *Determinaj adjektivoj*. Oni do atentu: ĉio dirita sub la ĉapitro *Pronomo* rilatas *sole* al la uzo *reprezentata* kaj *kvazaŭnoma*.

- 42 Oni distingas inter la pronomoj: la *personajn* (personaloj), *posedajn* (posesivoj), *montrajn* (demonstrativoj), *rilatajn* (rilativoj), *demandajn* (interrogativoj), *sumigajn* (kolektivoj), *nedifinajn* (indefinitivoj), *neajn* (negativoj) (*).

Ĉar tiuj pronomoj funkcias kiel substantivoj, ili similas ĉi lastajn en sia deklinacio. Tamen distingas ilin du karakteroj:

(*) Ni donas, por kompleteco, ankaŭ la internaciajn terminojn, sed en la libro ni prefere uzas la Esp-ajn nomojn. Esceptojn ni faras nur pri la jam ofte uzata *demonstrativo*.

1. pluraj el ili havas kroman kazon, la *genitivon*, kiu montras la posedanton. Kp. § 34. Rim. I.
2. ili ne povas, krom unu escepto, montri la sekson, sed ili posedas apartan sistemon por distingi la ulojn disde la aĵoj; alidire ili konfuzas viran kaj inan sekson, sed distingas apartan neŭtran genron.

PERSONPRONOMOJ (PERSONALOJ)

Difino

La personpronomoj estas tiel nomataj, ĉar ili servas por montri la diversajn personojn, kiujn oni povas aludi en konversacio: la parolanton (= 1a persono), la alparolaton (= 2a persono), la priparolaton (= 3a persono).

Ĉiuj personpronomoj finiĝas en Esp-o per *i*.

Genroj ekzistas nur ĉe la 3a singulara persono, kie oni distingas ulojn disde inoj kaj aĵoj. Tiun distingon montras ne sufikso, kiel ĉe la substantivoj, sed aparta radiko.

Nombroj ekzistas du, kiel ĉe la substantivoj; sed ankaŭ ilin montras ne finaĵo: la pluralo estas esprimita per aparta radiko, kio ne estas miriga: ni ne signifas "pluraj mi" sed "mi kaj aliaj".

Kazoj ekzistas tri, kiel ĉe la substantivoj, kaj estas sammaniere montrataj. La genitivo, kvankam teorie ebla (*mies, vies*), estas neuzata kaj anstataŭata de la posedaj adjektivoj (*mia, via*).

La personpronomoj unusilabaj estas senakcentaj, kiam ili senpere antaŭas la verbon: *mi venas* estas akcentata kiel "mizeras"; same: *ŝi forkuris*; *ĉu vi ĝin vidis?* Ili estas akcentaj, se ili ĝin sekvas: *estas mi*; *mortigu lin!* (Kp. § 274, ĉe-fine). Ĉe la prepozitivo, la akcento falas jen sur la prepozicion, jen sur la pronomon, laŭ tio ĉu la insisto estas sur la unua aŭ sur la dua. Komparu:

Ja nur kun vi kaj nur por vi mi vivas!

(Ifigenio)

kaj

Kiom de mi en silento

Al vi iris jam oferoj!

(Mia Penso)

Pli detalan klarigon vidu en "Parnasa Gvidlibro", pĝ. 13 § 6.

UNUA PERSONO

Kazoj	Singularo	Pluralo
Nominativo	<i>mi</i>	<i>ni</i>
Akuzativo	<i>min</i>	<i>nin</i>
Prepozitivo	<i>je mi</i>	<i>je ni</i>

Kontraŭe al la franca lingvo, kiam la 1a-persona pronomo estas kunordita kun aliaj vortoj, oni emas meti ĝin antaŭe: *mi kaj miaj infanoj*.

La personpronomo *mi* uziĝas ankaŭ kiel substantivo, por signi ĉies memon, kiu konscias pri sia vivo, kaj al kiu ĉiu rilatigas ĉion: *la animo ekrigardis la kuŝejon, kie kuŝis la polvoformitaĵo, fremda kopio de ĝia MiZ*. En tiu funkcio, ĝi ŝajnas nevaria: *estu kiel vi volas, se mi nur kunprenos kun mi mian "mi"!*z. Vd. § 50. Rim.

45

DUA PERSONO

Kazoj	Singularo-Pluralo
Nominativo	<i>vi</i>
Akuzativo	<i>vin</i>
Prepozitivo	<i>je vi</i>

Kiel oni vidas, la pronomo estas sama ĉe la dua persono por la du nombroj: tion kaŭzis naciaj kutimoj, kiuj igis opinii tro familiara kaj neĝentila la alparoladon al unu persono per singulara pronomo.

En tia okazo, la nombro estas montrata nur per predikativo aŭ apozicio: *vi estas diligenta; vi estas diligentaj; vi, sinjoro, eraras; vi, sinjoroj, eraras*. Oni povas do ĉiam, en okazo de bezono, klarigi la sencon per enmetita apozicio: *mi invitas vin (amiko); mi invitas vin (ambaŭ, ĉiujn, amikoj)*.

Ne estas ia motivo por majuskligi *vi* (singularo) nek *mi* (vd. tamen § 39, 5).

La pronomoj de la du unuaj personoj estas ĉiam kvazaŭnomoj.

Rim. Ekzistas en la Fundamenta Vortaro aparta pronomo por la dua persono singulara: *ci, cin, je ci*. Sed "en la lingvo mem ĝi preskaŭ neniam estas uzata" (Zamenhof, "Dua Libro"); oni trovas ĝin kelkfoje en poezio, por traduki nacilingvan nuancon, kaj en la esprimo: *ci-diri al iu*.

46

TRIA PERSONO

Formoj kaj distingo

Kazoj	Singularo		Pluralo
Nominativo	<i>vira</i> <i>ina</i> <i>neŭtra</i>	<i>li</i> <i>ŝi</i> <i>ĝi</i>	<i>ili</i>
Akuzativo	<i>vira</i> <i>ina</i> <i>neŭtra</i>	<i>lin</i> <i>ŝin</i> <i>ĝin</i>	<i>ilin</i>
Prepozitivo	<i>vira</i> <i>ina</i> <i>neŭtra</i>	<i>je li</i> <i>je ŝi</i> <i>je ĝi</i>	<i>je ili</i>

La 3a singulara persono estas la sola loko, en kiu la pronomoj havas apartan formon por distingi la seksulojn inter si kaj disde la senseksaĵoj. Ĉe la pluralo, Esp-o same kiel la angla aŭ germana, havas nur unu formon por la tri genroj. Tio kelkfoje povas ĝeni: *"Tiam Jesuo diris al ili [la virinoj]: Ne timu; iru, diru al miaj fratoj, ke ili foriru en Galileon kaj tie ili min vidos. Kaj dum ili iris..."* (Mateo, 28, 10-11). Kion reprezentas tiu lasta "ili", la virinojn aŭ la fratojn?

Rim. I. Por tiaj okazoj, oni jam antaŭ longe proponis la akcesoran formon *iŝi*; sed ĝi ne enradikiĝis. Cetere, la Z-a solvo estus la racia uzado de la pronomo montra anstataŭ persona: ... *kaj tie ili min vidos. Kaj dum tiuj iris...* (Kp. § 53, A. 2). La supraj triapersonaj pronomoj estas neniam kvazaŭnomoj: ili ĉiam reprezentas ion aŭ iun.

Teorie la distribuo de la tri pronomoj estas tre klara: oni uzas **li** por la viroj, **ŝi** por la virinoj, **ĝi** por la aĵoj. Sed praktike la uzado estas iom pli komplika:

a) Kiam temas pri kolektivo da homoj: la popolo, la nacio, la armeo, la societo ktp. — oni uzas **ĝi**: *Aaron levis siajn manojn al la popolo kaj benis ĝin^z; deklini la esperantistaron de ĝia klara vojo^z; ni ne povas iri al tiu popolo, ĉar ĝi estas pli forta^z*. Tamen kelkfoje oni povas trovi la pluralon **ili**: *la tuta popolo vidis, kaj ili ĝoje ekkriis^z* (kp. § 33. Rim.). Tio okazas precipe, kiam oni atentis pli individuojn ol la aron: *la metiĝo apartenis al maljuna paro; baldaŭ ili ekamis la silenteman submajs-tron^z; la popolo staris ekstere sur la strato kaj demandis, kia estas la stato de ilia landestro^z*.

b) Kiam temas pri homo, kaj se oni ne volas precize indiki la inan sekson, oni uzas **li**: *mi vokas la knabon, kaj li venas^z; la ekstero de tiu ĉi homo estas pli bona ol lia interno^z*. Same oni reprezentas per **li** la vortojn kunmetitajn per **-ulo**, la substantivigitajn participojn (**-anto**, **-ato** ktp.), la pronomojn **iu**, **tiu**, **ĉiu**, **neniu** (*Iu luktis kun li; vidante, ke li ne povas lin venki, tiu...^z; ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li^z*) kaj ĉiujn vortojn, kiuj esprimas homan rolon: oficisto, studento, bankiero, mastro, sekretario ktp.

Rim. II. Ecepte Z. uzas **ĝi** por reprezenti la vorton: persono; sed **li** estas almenaŭ tiel bona.

c) Kiam temas pri infano, ĉe kiu la demando pri sekso ankoraŭ ne tre gravas, oni uzas **ĝi**. Tamen Z. rimarkigas, ke "parolante pri infano, pri kiu ni scias, ke ĝi ne estas knabino (aŭ almenaŭ ne scias, ke ĝi estas knabino), ni povas uzi la vorton **li**". Tio signifas, ke ankaŭ la vorton "infano" ni povus envicigi sub b), kio estus pli natura.

d) Kiam temas pri bestoj, oni uzas ĉiam **ĝi**, "eĉ kiam oni precize parolas pri la sekso de la besto" (Z.). Oni uzas **li** kaj **ŝi** nur, se la klaro nepre tion postulus (ekzemple en longa rakonto, en kiu rolus nur bestoj aŭ por insisti pri la sekso): *melku bovon senfine, li lakton ne donos^z*.

e) Kiam temas pri personigitaj aferoj, oni uzas laŭvole **li**, **ŝi**, **ĝi**, laŭ tio, ĉu oni volas atribui al ili viran, inan, aŭ senseksan karakteron. En

iu fabelo de Andersen estas kolumo, kiu rolas kiel viro: la responda pronomo estas ĉie li; la virinajn rolojn ludas ŝtrumpa rubando, gladilo kaj tondilo: al ĉiu el ili respondas la pronomo ĝi. En aliaj, "la Morto" "la Vintro", "la Somero" estas reprezentataj per li, "la Modesto" per ŝi; same "la Fortuno" (ŝi) en Hamleto.

Uzado

47

1. – La ĉefa rolo de la triapersonaj pronomoj estas anstataŭi antaŭe esprimitan substantivon: *mia frato ne estas granda, sed li ne estas ankaŭ malgranda: li estas de meza kresko*^z.

Kiam, en la kontinua parolo, intervenas pluraj priparolataĵoj de diversaj seksoj aŭ nombroj, oni povas klare aludi ilin per la respondaj personpronomoj: *ĉiutage Knut pensadis pri Anjo, kaj nun li vidis, ke ankaŭ ŝi memoras pri li*^z; *staris la pastro sur la katedro... li diris, ke la homoj estas malpiaj...*; *li asertis, ke ilia vermo ne mortas... li tion diris kun plej granda certeco... li priskribis al ili la inferon...*^z.

Kiam la pluraj priparolataĵoj estas samseksaj aŭ samnombraj, oni povas aludi ilin ankaŭ per la respondaj personpronomoj, se la senco restas klara: *kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki*^z (la lasta ŝi reprezentas la virinon, sed tio estas klara, ĉar se ĝi devus reprezenti la subjekton de donu, oni uzus si [vd. § 160]). Se la senco ne estas klara, oni devas ŝanĝi la frazon, aŭ uzante alian pronomon (vd. § 53) aŭ ripetante la vorton: *se ni iam post prepozicio uzas akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj*^z ("ĝi tie dependas ne de ĝi" estus tute konfuza). Sed ĉiuokaze oni devas uzi personpronomon en subpropozicioj, kiuj troviĝas post aŭ interne de la ĉefpropozicio, por aludi al la subjekto de tiu ĉefpropozicio: *vidante, ke li ne povas gajni, la rajdisto haltigis la ĉevalon; la prezidanto deklaris, ke li abdikus, se...*; male, se la subpropozicio antaŭas la ĉefpropozicion, oni povas esprimi la subjekton en la subpropozicio kaj aludi ĝin per personpronomo en la ĉefpropozicio: *kiam la patro alvenis, li alvokis la infanojn* (kp.: *la patro alvokis la infanojn, tuj kiam li alvenis*).

2. – Apud tiu esenca rolo, Z. uzas la neŭtran personpronomon ĝi kun la proksimuma valoro de tio, sed iom pli sendifine. Oni renkontas tiun uzon en du okazoj:

a) por esprimi la tute ne precizan ideon de priparolataĵo en la esprimo ĝi estas: *ĝi estas tiu nokto, kiu estas dediĉata al la Eternulo*^z; *unu levigis... ĝi estis virino de meza aĝo*^z; *ĉu ĝi estas vi, sinjorino, kiu diris...?*^z; *en formo de hundidoj aŭ de io alia, ĝi ĉiam estas subaĉetoj*^z. En tia okazo la nuna kutimo estas simple forlasi la pronomon: *estas mi, kiu faris*.

b) por reprezenti la ideon de tuta, antaŭe esprimita propozicio: *la materialo por la vortaro devas esti romana-germana, ŝanĝita nur tiom, kiom ĝin postulas la kondiĉoj de la lingvo*^z; *mi juras, ke ĝi estas pura vero*^z.

Tiu anstataŭo de **tio** estas precipe bonvena por eviti ripeton de samaj silaboj, kiam en la kunteksto troviĝas **io**, **ĉio**, **tio**: *ĝi ne estas ankoraŭ io grava^z; ĝi estas ĝuste tio, pri kio mi volis paroli kun vi^z*. Sed ĝi donas iom trivialan tonon al la stilo kaj povus kelkfoje kaŭzi konfuzon: *li skribis tiun leteron; mi vidis ĝin* (ĉu: *mi vidis la leteron*, aŭ: *mi vidis lin skribanta leteron?*). En tiaj okazoj oni devas nepre uzi **tio**, kiu klare montras, ke temas pri la tuta ideo de la antaŭa propozicio: *li rakontis tiun historion; ĝi estas vera* (la historio) – *tio estas vera* (la fakto, ke li rakontis ĝin).

*

Al la 3a persono apartenas ankoraŭ du pronomoj, kiuj havas la saman karakteron, kiel **vi**: ili servas egale por ambaŭ nombroj.

Oni

La pronomo **oni**, kontraŭe al **li**, **ŝi**, **ĝi**, estas nur kvazaŭnomo; ĝi signifas "iu ajn", aŭ "iuj ajn".

48

Kazoj	Singularo-Pluralo
Nominativo	<i>oni</i>
Akuzativo	<i>onin</i>
Prepozitivo	<i>je oni</i>

Rim. Pro nacilingvaj kutimoj, oni emas uzi tiun pronomon nur nominative, kaj anstataŭigi ĝin per **ni**, **vi** aŭ **iu** ĉe la aliaj kazoj; sed la uzado de tiuj kazoj estas "tute regula" laŭ Zamenhof. Tamen, nek li mem uzis ilin iam, nek aliaj bonaj aŭtoroj ĝis nun.

La pronomo **oni** pro sia nedifina signifo povas aludi egale al unu aŭ al pluraj personoj. Tial oni trovas ĝin uzata jen singularo: *oni devas ĉiam esti preta^z*; jen plurale: *oni estas maljustaj koncerne ilin^z*; *oni estas konvinkitaj, ke li pereis^z*. La singularo estas ofte preferinda.

Anstataŭo de **oni** povas esti la pasiva nepersona formo de la verbo: *estas ordonite, ke li hodiaŭ vespere venu por kanti^z* (= *oni ordonis*): sed ĝenerale la signifo estas iom alia (vd. § 119 B).

Kiel **mi**, ankaŭ **oni** povas esti uzata substantive por signifi la sennoman amason da homoj: *al la buŝo de oni neniu povas ordoni^z*.

Si

La pronomo **si** neniam estas kvazaŭnomo. Ĝi servas por anstataŭi singularo kaj plurale la triapersonajn pronomojn, kiam tiuj reprezentas la subjekton de la propozicio: *Paŭlo lavas sin; ili fetis sin sur min*. Ĝi do ne havas nominativon:

49

Kazoj	Singularo-Pluralo
Akuzativo Prepozitivo	<i>sin</i> <i>je si</i>

Pri la uzo de si vd. propozici-sintakso, § 160-163.

Mem

50 Post la personpronomoj oni povas meti la senfleksian adverbos **mem** por insisti pri la identeco.

Ĝi havas du apartajn signifojn:

1. — ĝi servas por insisti pri la nealieco kaj identeco de la koncernataĵo: *li amas sin mem^Z; lasi la akceptadon al la decido de la esp-istoj mem^Z; jen li mem venas al ŝi renkonte^Z;*

2. — ĝi servas por montri, ke la aganto ricevas nenies helpon aŭ dependas de nenies influo: *tio estas komprenebla per si mem^Z; malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem^Z.*

Kiel oni vidas laŭ tiuj ekzemploj, **mem** estas uzata egale apud substantivoj, kiel apud personpronomoj. Okazas eĉ, ke ĉe la imperativo, kie oni ne esprimas la duapersonan pronomon, la adverbo rilatas al neniu esprima vorto: *prenu mem akvon^Z.*

Kontraŭe al la aliaj adverboj, **mem** lokigas ĉiam post la koncerna vorto. Kp. § 90.

Rim. Anstataŭ la nevaria **mi** (vd. § 44) oni nun prefere uzas la substantivon **memo**: *li ne konscias pri la malbonaj instinktoj de sia memo. Z.* cetere uzis "mem" substantive sen finaĵo: *nur tiu ĉi mia "mem" restu al mi fidela!^Z.*

POSEDPRONOMOJ (POSESIVOJ)

51 Ili ĉiam anstataŭas substantivon, samtempe montrante ties posedanton: *tiu libro estas mia.* Ilin formas la posedaj adjektivoj, antaŭataj de **la** kaj substantive uzataj. Ili montras per sia radiko la nombron kaj sekson de la posedanto, per sia finaĵo la nombron kaj funkcion de la posedato:

Personoj	Unu posedanto		Pluraj posedantoj	
	Unu posedato	Pluraj posedatoj	Unu posedato	Pluraj posedatoj
Unua	<i>la mia</i>	<i>la miaj</i>	<i>la nia</i>	<i>la niaj</i>
Dua	<i>la via</i>	<i>la viaj</i>	<i>la via</i>	<i>la viaj</i>
Tria	{ <i>vira</i> <i>ina</i> <i>neŭtra</i>	<i>la lia</i> <i>la ŝia</i> <i>la ĝia</i>	<i>la liaj</i> <i>la ŝiaj</i> <i>la ĝiaj</i>	<i>la ilia</i> <i>la iliaj</i>

Por unu aŭ pluraj posedantoj: *la onia, la oniaj – la sia, la siaj*.

Deklinacio, kiel ĉe la substantivoj: *la mia, la mian, je la mia* ktp.

La posedpronomoj, kiam ili rolas kiel reprezentantoj, estas akompanataj de la artikolo. Tamen, oni trovas ilin ankaŭ sen la artikolo: *via pano estas pli freŝa ol mia*². Tion oni povas pravigi tiel, ke ĉi tie la posedpronomo estas ne reprezentanto, sed determinanto de la subkomprenata substantivo: *ol mia (pano)*. Do la mankon de artikolo oni ne povas rigardi eraro, sed kun artikolo la esprimo estas pli plastika.

Rim. Zamenhof ŝajne rezervis la uzon de la artikolo antaŭ posesivoj, por signifi, ke temas pri samfamilianoj: *Vi ankaŭ min redonu al la miaj* (Ifig. p. 7); *kial al li estus permesite ekspluati por si kaj por la siaj ĉion, kion ajn li posedus en la provizejo de sia menso?*² Sed probable la ĝusta pravigo de la uzado de la artikolo en tiaj okazoj estas, ke ĝi "difinas" elekton inter pluraj similaj objektoj, do estas uzata en ties propra senco. Komparu: *Kies estas tiu mantelo? – Ĝi estas mia* (= ĝi apartenas al mi), kaj: *Ĉiu retrovu sian mantelon! – Tiu ĉi estas la mia!*

MONTRAJ PRONOMOJ (DEMONSTRATIVOJ)

La *demonstrativoj* ĝenerale servas por montri personon aŭ aĵon, kiun oni povus indiki per gesto: sed tiu montra signifo povas esti tre malforta kaj apenaŭ sentebla: *tiu, kiuj tiel agos, estas malnobluloj*.

52

Formo kaj distingo

Ili havas du formojn, unu *individuigan*, kiu servas por ĉiuj genroj, kaj alian, kiu povas esti uzata nur ĉe la *neŭtra*.

Ĉe la demonstrativoj oni devas zorge distingi la uzon de kvazaŭnomo disde la uzo de reprezentanto. Uzata kiel kvazaŭnomo, la individuiga formo montras nur personojn (homojn): *li ne similas al tiu, kiun mi vidis*; kaj la neŭtra formo montras aferojn aŭ bestojn: *li ne similas al tio, kio li antaŭe estis*²; *li surtretis ion, kaj tio lin pinĉis: estis krabo*. Uzata kiel reprezentanto, la individuiga formo anstataŭas ian ajn antaŭan substantivon, kaj montras personon, beston aŭ aĵon: *li donis al mi du librojn: tiu estas interesa kaj tiu ĉi ne*. La neŭtra formo tiam servas por anstataŭi la ideon de antaŭe esprimita propozicio: *li donis al mi librojn: tio estas amika ago*; aŭ antaŭe esprimitan pronomon (io, ĉio, nenio): *li donis al mi ĉion: tio ne estis multo*.

La demonstrativoj havas 4 kazojn:

Nombroj	Singularo		Pluralo
	Individuiga	Neŭtra	
Formoj			
Nominativo	<i>tiu</i>	<i>tio</i>	<i>tiuĵ</i>
Akuzativo	<i>tiun</i>	<i>tion</i>	<i>tiuĵn</i>
Genitivo	<i>ties</i>	<i>ties</i>	<i>ties</i>
Prepozitivo	<i>je tiu</i>	<i>je tio</i>	<i>je tiuĵ</i>

53

A. Individuiga formo. Oni ĝin uzas en 4 ĉefaj okazoj:

1. – por akompani aŭ anstataŭi geston, kaj tiel klare difini la priparolataĵon: *Kiun el la lernantoj vi vidis ŝtelanta? – Tiun (aŭ tiun ĉi).*

2. – En la daŭro de rakonto, por montri ŝanĝon de priparolato. Ni vidis supre (§ 47), ke por ripete aludi la saman priparolaton en pluraj prop-oj oni uzas personpronomon; male, se en la rakonto intervenas alia persono, kaj subite tiu persono fariĝas la priparolato de la sekvanta verbo, oni uzas por aludi ĝin ne personan, sed montran pronomon: *Jakob alproksimiĝis al Isaak, kaj tiu lin palpiz^z; Abraham cirkumcidis sian filon Isaak, kiam tiu havis la aĝon...^z; se iu batas homon, kaj tiu mortos, li estu mortigita: sed se Dio puŝis tiun sub lian manon...^z; ili vendis Jozefon al Išmaelidoj, kaj tiuj forkondukis Jozefon^z; ili renkontis knabinojn, kaj ili diris al tiuj... kaj tiuj respondis al ili kaj diris...^z.* Same oni uzas ties anstataŭ ĝia, ĝiaj, se la posedanto ne estas la subjekto de la antaŭa propozicio: *la inko makulis la leteron kaj eĉ ties koverto fariĝis nelegebla.* Kp. § 79.

3. – Sen ia ajn montra signifo, kiel reprezentaton de rilatpronomo: *nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras^z; plej bone ridas tiu, kiu ridas la lasta^z.*

4. – Por anstataŭigi, antaŭ prepozicia suplemento, antaŭe esprimitan substantivon: *mia libro estas pli bela ol tiu de mia frato; la vegetaĵoj en potoj kreskas tiel prospere, kiel tiuj en grundo.*

B. Neŭtra formo. Oni uzas ĝin en 5 okazoj:

1. – por akompani aŭ anstataŭigi geston, kiam oni ne volas aŭ ne povas guste nomi aferon: *donu al mi tion!*

2. – en la kontinua parolo por prezenti priparolaton, kiun oni ne volas aŭ ne povas precizigi: *ĉu tio estas vi, Ivan?^z; se iu faris promeson dediĉi animon al la Eternulo kaj se tio estos virino, tiam...; se tio estos aĝulo...; se tio estos bruto...^z; tio estis en la monato Majo^z.*

3. – por anstataŭigi la antaŭe esprimitan pronomon io aŭ ĉio aŭ nenio: *li transdonis al mi ĉion: tio ne estis multo; io falis sur mian kapon: tio estis ŝtoneto.*

4. – por anstataŭigi la ideon de antaŭe esprimita propozicio: *li ne subskribis sian leteron, kaj tio estis malnoblaĵo (tio: la nesubskribado; se oni uzus tiu, ĝi signifus: la letero; kp. § 52); post tio oni en la ĉambro parolis pri aliaj aferoj^z.*

5. – por anonci sekvantan rilatan aŭ eksplikan subpropozicion: *ŝi rakontis tion, kio okazis al ŝi^z; la dua kulpigo... estas tio, ke ni estas malbonaj patriotoj^z; ĉio dependas de tio, kiel oni konsideras la aferon.*

Rim. I. Oni ellasas la demonstrativojn inter ĉiuj kaj kiuj, aŭ ĉio kaj kio; ekz-e: *ĉiuj, kiuj parolis, estis friponoj.*

Rim. II. Kutime oni ne uzas ties en antaŭa ĉefprop-o kiel reprezentaton de kiu(j): *ni ŝuldas ĉion al la boneco de tiu (ne ties), kiu nin kreis.* Sed oni devas ĝin uzi, se

la rilata subprop-o estas antaŭmetita: *kiu difektos al li eĉ unu haron, ties karnon mi disŝiros je pecoj*^z.

C. Tia. Kiel reprezentanto estas uzata ankaŭ **tia**. Per ĝi oni montras:

1. pri adjektivo: *mi volis, ke vi estu kontentaj, sed mi ne sukcesis igi vin tiaj; mi volas aĉeti freŝajn fruktojn, sed vi ne havas tiajn*.

2. pri nedifinita substantivo: *vane vi serĉas pinglon, en la tuta domo ne troviĝas tia; vi kredas min profesoro, sed mi ne estas tia.* (Kp.: *vi kredas min la profesoro, sed mi ne estas tiu*).

Rim. Se la demonstrativo havas la saman kazon kiel la nedifinita reprezentato, ĝi estas ellasebla: *mi bezonas paperon, ĉu vi havas?*

* * *

Al la montraj pronomoj oni povas, laŭbezone, aldoni du adverbojn, ĉi kaj jen.

Ĉi

Ĉi povas esti almetita al **tiu** (**tiuj**, **tiun**, **tiujn**) kaj **tio**, **ties**, ĉu ili rolas kiel pronomoj aŭ kiel adjektivoj (§ 80), por akcenti la proksimecon en spaco aŭ tempo. Oni lokas ĝin antaŭ aŭ post la pronomo laŭ la postuloj de la ritmo aŭ belsoneco (plejofte antaŭe): *ĉi tiu libro; tiu ĉi libreto*. Oni neniam ligas ĝin al la pronomo per streketo.

Rim. I. Propre ĉi estas loka adverbo, montrante proksimecon; ĝi estis uzata de Zamenhof en tia funkcio ĉe verbo: *se korpe mi forestas, spirite mi estas ĉi!*; ili *pepadis: "Ĉi ni estas!"*; *tute ne ĉi estis vento* ktp.

Rim. II. Ĉi almetiĝas ankaŭ al la adverbo **tie**, sed ne ĝis nun al **tiam** (ĉi tiam = nun), nek al **tiel** (ĉi tiel = jene), nek al **tial** (ĉi tial = jen kial, ĉi-kaŭze). Krome, prefikse ĝi almetiĝas al adverboj: *ĉi-matene, ĉi-loke, ĉi-maniere, ĉi-kune, ĉi-rilate, ĉi-koncerne*, aŭ al substantivoj por pluformi adjektivojn: *ĉi-jara rikolto; vi, malgranda griza ĉi-landa birdo!*^z Oni rimarkos, ke en ĉi tiu lasta okazo ĝi ligiĝas per streketo.

Rim. III. Analoge al la uzado antaŭ adverboj, kaj pro deziro al mallongigo, ĉi estas ofte uzata en poezio anstataŭ la kompletaj formoj (*ĉi tiu, ĉi tiuj, ĉi tiun, ĉi tiujn*): *vi tute rajte faros ĉi ribelon*. Tiu uzo estas pravigebla tiel, ke ĉi, same kiel ĝi alproksimigas objekton signitan per **tiu** aŭ **tio**, povas alproksimigi ankaŭ la objekton mem, kies nomon la montraj pronomoj anstataŭas: *mi vidis ĉi homon* estas analoga al: *mi vidis ĉi tiun*. Kp. § 88 **Rim. IV.** Kiel oni vidas, en tiu ĉi okazo ĉi ligiĝas sen streketo.

Ĉi servas en tri okazoj:

1. — por montri el pluraj aferoj la plej proksiman al la parolanto: *donu al mi tiun ĉi libron; etendante la dekstran manon al la presita libro kaj la maldekstran al la katedralo Nia Sinjorino: Ho ve! li diris, ĉi tio mortigos tion*.

Rim. IV. Francoj ofte uzas **tiu** sen ĉi parolante pri tio, kion oni faras, verkas, pri-traktas en la concerna momento: *mi skribas al vi nun tiun leteron rapide; mi ne volas longe paroli pri tiu* (recenzata) *libro*. Tio estas evitinda: oni devas aldoni ĉi.

Rim. V. La plimalproksimeco estas montrata nur negative, per signo nula: *kiun li-*

54

bron vi volas, ĉi tiun aŭ tiun? En okazo de neceso oni eble povus uzi **malĉi**, sed tiu ĉi formo estas, kvankam logika, tro stranga por esti aplikata. Eble pli taŭgas for: *la du ĉevaloj, tiu ĉi kaj tiu for.*

2. – por montri, inter pluraj preparolotoj, la laste nomitan; en tiu rolo, ĝi alternas kun **tiu**, **tio**, kiuj signifas la pli frue nomitan: *ne estas moro, ke oni donu la pli junan (Raĥel) antaŭ la pli maljuna (Lea); pasigu semajnon kun ĉi tiu (L.); tiam mi donos al vi ankaŭ tiun (R.); kaj Jakob faris tiel kaj pasigis semajnon kun ĉi tiu (L.)...^Z.*

3. – por pli vigle kaj atentinde prezenti parolataĵon: *li ellasis la kolombon, kaj ĉi tiu jam ne plu revenis al li^Z; la Eternulo favoris al la popolo la Egiptojn kaj ĉi tiuj pruntedonis al ili^Z; tio ĉi estis feino^Z.* En tiu okazo ĉi **tiu** preskaŭ egalvaloras kiel **jen ĝi**, **jen ili**... ktp.

Jen

55

Jen servas por akcenti la viglecon de la prezentado kaj atentigi pri tio, kion oni tuj diros. Ĝi lokiĝas ĉiam antaŭ la koncerna pronomo montra: *jen tio min haltigas^Z; jen tiun homon mi deziris renkonti!*

Kiam la montra pronomo servus nur por enkonduki rilatan subpropozicion, oni forigas ĝin, kaj uzas **jen** rekte antaŭ la rilata pronomo aŭ adverbo: *jen kion mi respondis; jen kiom mi ŝuldas.*

Oni uzas **jen** ankaŭ, sed malofte, ĉe la montraj adjektivoj kaj adverboj: *jen tiajn ekzemplojn vi devas sekvi; jen tiel!* (= fine, estas farite).

Fine, oni uzas **jen** komence de frazoj, kun la proksimuma signifo de "atentu, rigardu, rimarku", ekz-e: *vi serĉas la princon? Jen li estas!^Z Jen vi havas!^Z (tio estas destinita al vi!); jen estas la tempo por agi! jen Ofelio perdis la prudenton!^Z.*

Jen ripetite signifas: "unu fojon... alian fojon...", ekz-e: *ŝi ĉiam portas ombrelon, jen ruĝan, jen blankan; jen li veturis tra la arbaroj, jen meze tra urbo^Z.*

Rim. I. Pli akcentata formo estas **jene**: *ni jene aranĝos la aferon^Z.*

Rim. II. El **jen** oni povas formi adjektivon, kiu ludas veran rolon de montra adjektivo, kun la signifo "tiu ĉi montrata, tiu sekvanta": *ankoraŭ pli mallonga vojo estas jena...^Z; se vi deziras pomon, prenu do la jenan!* Oni formas ankaŭ substantivon, kun la signifo "tio, kio sekvas"; *via unua afero, kiam vi venos en la urbon, devas esti jeno^Z; mi volas komuniki al vi la jenen^B.* Kiel oni vidas, ^Z. ordinare ne uzas artikolon antaŭ **jena** kaj **jeno**, ĉar ili estas per si mem difinitaj; tamen ties uzado pli kaj pli oftigas.

Rim. III. Por resumi tion, kio antaŭas, oni uzas ĉi **tiu**, ĉi **tiuj**, ĉi **tio** (apliko de la ĉi-supra regulo, § 54. 2), kaj **jena**, **jeno** por anonci tion, kio sekvas: *ĉi tiuj estis la atestantoj de la edzo – la atestantoj de la edzino estis la jenaj...; tion ĉi li diris, kaj mi respondis jenen...*

RILATPRONOMOJ (RILATIVOJ)

Difino kaj formo

La rilatpronomoj havas kompleksan naturon: ili estas samtempe pronomoj kaj subjunkcioj. Efektive, ili reprezentas substantivon esprimitan en alia propozicio (kiel la personaj aŭ montraj pronomoj) kaj samtempe ili subordigas al tiu alia propozicio la propozicion de ili enkondukitan. Ekz-e: *li skribis la leteron, mi vidis ĝin* konsistas el du memstaraj propozicioj, kaj en la dua prop-o *ĝi* anstataŭas la vorton *letero*. Sed en la frazo: *mi vidis la leteron, kiun li skribis*, la pronomo *kiu* ne nur anstataŭas la vorton *leteron*, sed samtempe ĝi ankaŭ subordigas la duan propozicion al la unua. Ni vidis, ke la anstataŭatan substantivon oni nomas *reprezentato*.

La rilatpronomoj havas du formojn: la individuigan, por ĉiuj genroj; kaj la neŭtran.

Ankaŭ tie ĉi oni devas distingi inter kvazaŭnoma kaj reprezenta uzado. Uzata kiel kvazaŭnomo, la individuiga formo montras nur homojn: *kiu pasis preter okazo, neniam ĝin retrovos^z*; dum la neŭtra signas aferojn aŭ bestojn: *kio pasis, ne revenos^z*; *kio vin pikis, estis nur kulo*. Uzata kiel reprezentanto, la individuiga formo montras personon, beston aŭ aĵon: *mi legis la libron, kiun vi donis al mi*; kaj la neŭtra povas anstataŭi nur neŭtran aŭ propozician reprezentaton: *li ridas konstante, kio estas netolerebla*; *mi scias tion, kion vi diris*.

La rilatpronomoj havas 4 kazojn:

Nombroj	Singularo		Pluralo
	Individuiga	Neŭtra	
Formoj			
Nominativo	<i>kiu</i>	<i>kio</i>	<i>kiuj</i>
Akuzativo	<i>kiun</i>	<i>kion</i>	<i>kiujn</i>
Genitivo	<i>kies</i>	<i>kies</i>	<i>kies</i>
Prepozitivo	<i>je kiu</i>	<i>je kio</i>	<i>je kiuj</i>

Rim. I. La genitivo *kies* signas ekskluzive:

a) posedanton: *kies panon oni manĝas, ties agojn oni laŭdas^z*; *malproksimajn landojn, kies lingvojn ni ne komprenas*;

b) objekten suplementon: *pro kio do tiuj reformoj, kies sola propono estas jam danĝera?^z*

Rim. II. La formo *kies*, konforme al la germana "wessen", la rusa "ĉej" ktp., sed kontraŭe al la latina "cuius", al la franca "dont" ktp., entenas en si mem ideon pri difiniteco de la determinato: tial oni neniam esprimas post ĝi la artikolon; tial ankaŭ oni ne povas uzi post ĝi, kiel determinaton, nedifinan pronomon. Oni do povas diri: *la homaranismo, kies unu el la plej ĉefaj dogmoj estas batalado...^z*; *la socia problemo, kies unu el la reprezentantoj kaj viktimoj ŝi estis^z*, ĉar la determinatoj (*dogmoj, reprezentantoj, viktimoj*) estas difinitaj; sed oni devas diri: *faroj*,

el kiuj unu sola povus instrui lin esperi^z; Hebreaj akuŝistinoj, el kiuj unu estis nomata Sifra kaj la dua estis nomata Pua^z; ŝtuparoj, el kiuj unu kondukis rekte en la maron^z ktp.

Lokado

57

Kiel oni vidis, la rilatpronomoj staras preskaŭ ĉiam komence de sia prop-o. Ĉe kies oni postmetas la determinaton, ĉiam sen artikolo: *kies panon...*

Tamen, oni devas esplori la sekvantajn okazojn:

a) se la rilatpronomo mem havas prepozicion, ĝi staras, kune kun la prepozicio, antaŭe; ĝin sekvas, eventuale kun la artikolo, ĝia determinato: *tiuj urboj, el kiuj ĉiun ni vizitis; la lingvaj sciencoj, pri kiuj profesoro estas serĉata; la akvo, el kiu la duonon vi trinkis...*

b) se la determinato de *kies* havas prepozicion, oni metas antaŭ *kies* la prepozicion kaj post *kies* la substantivon de la prepozicio: *jen estas la signoj, per kies potenco...^z; la serpento, de kies mordo mortis via patro^z.*

c) se kaj la rilatpronomo kaj ties determinato havus prepozicion, estas konsilinde transformi la frazon, ĉar tia konstruo estas tro peza. Ni ne povis trovi Z-an ekzemplon pri tio. Se oni tamen uzas tiajn konstruojn, ŝajnas plej bona postmeti la prepozician rilatpronomon: *multegaj moskeoj, de super ĉiu el kiuj aŭdiĝas kantoj* (pli bone: *kaj de super ĉiu moskeo...*); *la bankiero, pri la atenco al kiu vi certe aŭdis* (pli bone: *pri kiu vi certe aŭdis, ke oni lin atencis*).

Rim. La reprezentato de la rilatpronomo povas esti mem apudmetita al la antaŭa propozicio, *kies* ideon ĝi resumas; tiam ĝi staras, sen artikolo, tuj post la rilatpronomo, kiu lasta funkcias kiel rilata adjektivo: *ili decidis ne plu transpagi la monon, kiu transpago estis la sola rimedo savi nian asocion (= transpago, kiu...); kiu hundo bojas, tiu ne mordas (= hundo, kiu...)*. vd. § 81.

Uzado

58

A. Individuiga formo. Oni uzas ĝin:

1. por anstataŭi antaŭe esprimitan substantivan aŭ pronoman reprezentaton: *li, kiu estis mia plej bona amiko, perfidis min; la fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas varmega^z.*

2. por prezenti, kun aŭ sen akompano de *tiu*, homan sendifinan personon: *kiu okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto^z; kiu koleras, tiu ne prosperas^z.*

B. Neŭtra formo. Oni uzas ĝin:

1. por anstataŭi antaŭe esprimitan adjektivon, substantive uzatan kaj montrantan sendifinan aĵon: tiun uzon oni trovas, ĉe bonaj aŭtoroj, nur post adjektivoj en formo de superlativo aŭ kun sama valoro (la unua, la lasta, la sola): *la plej bona, kion oni povas fari, estas...^z; tio estus la plej terura, kio povus al mi okazi^z; la sola, kion ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi^z; la unua, kion ili aŭdis, estis...^z.*

2. por anstataŭi la ideon de antaŭe esprimita propozicio: *li havis tempon por ekzerci la soldatojn, kio estis lia plej amata okupo; la forigo de la supersignoj kaj de la akuzativo, kion (= afero, kiun) mi antaŭ 16 jaroj proponis...*² Vd. § 226.

3. por prezenti, korelative kun **io**, **tio**, **ĉio**, **nenio**, aŭ eĉ sola, sendifinan aferon: *kio mia, tio bona*²; *la urbo faris ĉion, kion ili povis*²; *mi vidis nenion, kio povus haltigi min; kio min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas!*²; *sorto ofte absendas, kion oni ne atendas*².

Rim. I. Kiam **io**, **tio**, **ĉio**, **nenio** estas akompanataj de kvalifika adjektivo, ilia rilatpronomo, male, devas esti **kiu**: *mi silentiĝis pro io majesta, kiu super ni ŝvebis*²

C. Kia. Kiel rilatpronomo estas uzata ankaŭ **kia**. Ĝi reprezentas, kun nuanco de komparo, la tutan ideon de kvalito esprimitan en la ĉefpropo

1. aŭ per **tia**, akompanata aŭ ne de substantivo: *la bildo ne estis tia, kiajn oni ordinare vidas*²; *kia naskiĝis, tia grandiĝis*²; *kia oni vin vidas, tia oni vin taksas*²;

2. aŭ per substantivo kvalifikita per adjektivo: *grandaj birdoj, kiajn la anasido neniam ankoraŭ vidis antaŭe*²;

3. aŭ per nedifinita substantivo, kiu mem enhavas sencon de kvalito: *vi kredas lin riĉulo (profesoro ktp.), kia li ne estas. Kp. vi kredas lin la profesoro, kiu li ne estas* (Vd. § 53. C. 2).

Rim. II. Oni uzas **kia** nur, se la subprop-o difinas la kvaliton anoncitan per **tia**; aliokaze, kaj precipe se enestas ideo de konsekvenco, oni uzas **kiu**. Kp: *ekzistas inter ili tiaj, kiaj ridas tro multe, por elvoki ridon ĉe la amaso*²; *tiu nomo por tia spirito, kia plenigis la belan estaĵon, estis tro milda*²; kaj: *ĉu vi jam vidis tiajn homojn, kiuj ĵetas sian monon al la kloako?*² (tiajn, ke ili...); *kvazaŭ mi estus tia virino, kiu povas rompi la ĵuron de fideleco!*²

Rim. III. Por esprimi nedifinitecon, oni povas meti post la rilatpronomoj la adverb **ajn**: *kiu ajn ŝtelis la horloĝon, tiu estas ankoraŭ en la domo; kiu ajn tion diras al vi, estas malsaĝulo*². Sed ofte la rilatpronomo kun **ajn** fariĝas kvazaŭnomo, kaj ne havas plu esprimitan reprezentanton: *kiu ajn tion diras, mi restas dubanta; mi mensogis, kion ajn mi diris*² (vd. § 258. II.). Kp. § 63. Rim. II.

DEMANDOPRONOMOJ (INTEROGATIVOJ)

La demandpronomoj servas por demandi pri io aŭ iu. Ili havas la samajn formojn, kiel la rilatpronomoj: sekve, uzataj kiel kvazaŭnomoj, ili montras per sia individuiga formo nur homojn: *kiu falis?* kaj oni uzas la neŭtran por demandi pri afero aŭ besto: *kio falis? kio min mordis?* Sed, diference de la rilatpronomoj, nur la individuiga formo estas uzata kiel reprezentanto; ĝi demandas egale pri homo, besto, aĵo, kun la nuanco de elekto el grupo da samspecaj uloj aŭ aĵoj:

Jen du katoj; kiu pli plaĉas al vi? El miaj libroj, kiun vi preferas?

*Kian specon de sentoj mi devos elekti? Kiuj plej furioze atakas la floradon de la vivo?*²

Apartan okazon prezentas la uzo de la demandpronomoj kiel predikativoj ĉe la verbo **esti**: en tiu funkcio, ili alprenas iom de la karaktero de la

demandaj adjektivoj (§ 82), kaj ilia senco fariĝas iom pli vasta: *kia estas la celo?*^Z; *kia estas la kaŭzo, ke...?*^Z; *kiel krei tian konstantan fonton, kaj kia ĝi devas esti?*^Z.

Kio estas tiam la plej ĝenerala demandilo, kaj povas rilati al singulara aŭ plurala subjekto: *kio brulas?*^Z; *kio estas la Oficialaj Aldonoj?*; *kio estis liaj lastaj vortoj?*^Z; *Kio estas tiuj paperoj?* – *Balaindajoj!*

Kiu demandas pri la individueco de persono aŭ afero:

Kiu estas vi? – *Mi estas Andreo Cseh.*

Kiu estis la unua Esperanta gazeto? – *”La Esperantisto”.*

Kiuj estas tiuj paperoj? – *Fakturetoj.*

Uzata pri homo, **kio** demandas pri ties profesio, loko en la societo ktp., **kio** pri lia identeco:

Kio mi estas por li, ĉu komercisto aŭ metiisto?^Z

Li ne estas rajtigita persono! – *Kio do li estas?*^Z

Kio estas Aaron, ke vi murmuris kontraŭ li?^Z

Kiu estas tiu sinjorino Szwejc?^Z

Kaj kiuj ni devas esti? – *Viroj!*^Z

Rim. I. **Kio** estas ankaŭ uzata kun la ofte najbara senco de miro aŭ ekkrio: *Kion mi vidas!*^Z De tiu uzo, ĝi facile glitis al la rolo de preskaŭa interjekcio: *Kio! Senhonte aŭskulti la amesprimon de sinjoreto!*^Z

Rim. II. Ĉe dependa demando, oni neniam esprimas la reprezentaton: *mi ne scias, kiu venis; ili ne havas per kio aceti lignon*^Z.

SUMIGPRONOMOJ (KOLEKTIVOJ)

60

Ĉiu

Ideon pri kolektivo oni esprimas per la pronomo **ĉiu**, kiu ne havas la saman signifon singulare kaj plurale. Singulare ĝi montras, ke en la koncerna kolektivo la unuopaj personoj aŭ aferoj estas konsiderataj individue, aparte; plurale ĝi montras, ke oni sendistinge konsideras la tutan kolektivon. Ambaŭ signifojn klare prezentas la sekvanta ekzemplo: *ĉiu por si, por ĉiuj Di!*^Z.

Kiam **ĉiu** estas uzata, kun refleksivo, en apozicio al substantivo, ĝi restas ĉiam en singularo, kaj estas rigardata kiel triapersona pronomo: *ni devas nun ĉiuj egale labori, ĉiu laŭ siaj fortoj*^Z; *ili penados baldaŭ fondi klubojn, ĉiu en sia urbo*^Z.

Ĉiu, same kiel **iu** aŭ **tiu**, havas du formojn; la *individuiga*, uzata kiel kvazaŭnomo, montras nur homojn: *ĉiu forĝas sian sorton*^Z; *sola kontraŭ ĉiuj*; uzata kiel reprezentanto, ĝi montras sendistinge homojn, bestojn, aĵojn: *mi provos ĉiun el la ŝuparoj*; *mi ne volas tiun aŭ tiun libron, mi volas ĉiujn*. La neŭtra formo estas uzata nur kiel kvazaŭnomo, kaj montras nur ideon aŭ aferon: *al ĉio oni povas alkutimiĝi*^Z.

Ĉiu havas 4 kazojn:

Nombroj	Singularo		Pluralo
	Individuiga	Neŭtra	
Nominativo	<i>ĉiu</i>	<i>ĉio</i>	<i>ĉiuj</i>
Akuzativo	<i>ĉiun</i>	<i>ĉion</i>	<i>ĉiujn</i>
Genitivo	<i>ĉies</i>	—	<i>ĉies</i>
Prepozitivo	<i>je ĉiu</i>	<i>je ĉio</i>	<i>je ĉiuj</i>

Rim. La genitivo estas uzata ordinaro nur pri personoj.

Ambaŭ

61

Kiam temas nur pri du aferoj, oni uzas anstataŭ **ĉiuj** la nevarian pronomon **ambaŭ**, kiu, kvazaŭnomo, montras nur personojn: *ambaŭ samtempe abdikis*, kaj, reprezentanto, povas montri homojn, bestojn, aĵojn: *kiun vi prenas el la du ĉapeloj?* – *Ambaŭ!*

Rim. I. Oni ne uzu **ambaŭ** anst. *la du* aŭ *tiuj du*, sed nur anst. *ĉiuj du*. Por kontrolo, oni metu *tri* anstataŭ *du*; se oni uzus *la tri*, oni uzu **la du**: *la tri (la du) fratofromenis kune*; se oni uzus *ĉiuj tri*, oni uzu **ambaŭ**: *ĉiuj tri (ambaŭ) fratof estis lamuloj*.

La nevarieco de tiu pronomo klariĝas per tio, ke oni rilatigas ĝin kun la numeraloj: *Jordano inundis siajn ambaŭ bordojn*^Z.

Ambaŭ, uzata apozicie al pronomo, estas metata post tiu: *neniam aliaj povas fariĝi pli feliĉaj, ol ni ambaŭ*^Z; *kaj malfermiĝis la okuloj de ili ambaŭ*^Z.

Male, substantivaj apozicioj al tiu pronomo estas metataj poste: *pli bone estas iri senfila en la ĉielon, ol se ambaŭ, la patro kaj la filo, iras en la inferon*^Z.

Fine, **ambaŭ** povas esti metata iom memstare, kaj en tiu okazo ĝi akiras sencon proksiman al **duope**: *ambaŭ kune vivi ni ne povas!*^Z; *oni devas peni trovi rimedon, ke ili povu ambaŭ paroli inter si*^Z.

Rim. II. En pluraj ĉi-supraj ekzemploj Zamenhof uzis **ambaŭ** en la senco de **du**, precipe apud personaj pronomoj: tio estas propre germanismo; estus pli logike uzi **du**, kiam forestas la ideo pri ĉiuj, kaj diri: *ĉiuj sidiĝis ĉirkaŭ la du fratof*; *ni du estas Hungaroj*; *kiel senditojn, elektu ilin du*.

Rim. III. Zamenhof notis en siaj Lingvaj Respondoj: "Kvankam mi ofte uzis la formon 'la ambaŭ', tamen mi opinias nun, ke pli logike estas uzi la vorton 'ambaŭ' sen artikolo".

Kvantodifinaj adjektivpronomoj

Apud la sumigpronomoj oni povas klasi la pronomojn, kiuj en pli-malpli difina maniero esprimas la kvanton; ili estas: **alia**, **kelkaj**, **mal-**

62

multaj, multaj, pluraj. Tiuj vortoj estas pronomigitaj adjektivoj, kaj sekve deklinaciigas kiel adjektivoj (vd. § 67).

Uzataj kiel kvazaŭnomoj, ili montras nur homojn: *iuj parolas, aliaj silentas; kelkaj supozas, ke...; la verko de Chaptal, kiu instruas al multaj la misterojn de la franca lingvo...^z; malmultaj opinias tiamaniere; pluraj furioze demandis.* Kiel reprezentantoj, ili povas indiferece montri homojn, bestojn, aĵojn: *inter tiuj juveloj, malmultaj estas el arĝento, kelkaj el onikso kaj pluraj el oro.*

Oni rimarkos, ke, krom **alia**, la ceteraj pronomoj estas, pro sia signifo, nur plurale uzataj.

Rim. Ĉar al la duobla uzado de tiuj vortoj (pronomaj kaj adjektiva) respondas nur unu sola finaĵo, la adjektiva -a, oni kelkfoje sentas danĝeron de konfuzo. Tial, jam de multaj jaroj, oni emas distingi tiujn du uzadojn per du finaĵoj, almetante ankaŭ al ili, kiam ili estas pronome uzataj, la finaĵon -u, analogan al *iu, tiu, kiu*. Tio estis plej facila kun **alia**, kies radikoj finiĝas per *i*. Oni provis kaj nun, pli-malpli ofte, uzadas la (nefundamentan) deklinacion (genitivo nur pri personoj):

Nombroj	Singularo		Pluralo
	Komuna	Neŭtra	
Nominativo	<i>aliu</i>	<i>alio</i>	<i>aliuj</i>
Akuzativo	<i>aliun</i>	<i>alion</i>	<i>aliujn</i>
Genitivo	<i>alies</i>	—	<i>alies</i>
Prepozitivo	<i>je aliu</i>	<i>je alio</i>	<i>je aliuj</i>

Ekzemploj: *iuj alvenis, aliuj foriris; ies gajno, alies perdo* (B. Mudie, 1906) ktp.: *tio kaj alio^z.*

La ceterajn pronomojn kelkfoje oni kunmetas kun la pronomo **iu**: *kelkiuj, multuij (pluriuj* estus logika, sed ne uzata). Formoj ne kontraŭfundamentaj, sed pezaj. Male **kelkiu** estas absurda, ĉar **kelk** montras pluralon, se temas pri kalkuleblaj aferoj.

NEDIFINAJ PRONOMOJ (INDEFINITOJ)

Iu

63

La plej nedifina pronomo estas **iu**. Ĝi, same kiel la demonstrativoj kaj rilativoj, havas du formojn: individuigan kaj neŭtran. La *individuiga*, uzata kiel kvazaŭnomo, montras nur homojn: *iuj asertas, ke...; kiel reprezentanto, ĝi indiferece montras homojn, bestojn, aĵojn: iuj el la libroj estas ŝiritaj; la neŭtra* formo estas uzata nur kvazaŭnome kaj montras nur aferojn aŭ aĵojn: *io okazis; io* (ĉu dorno, ĉu kulo? ...) *min pikis.*

Iu havas 4 kazojn:

Nombroj	Singularo		Pluralo
	Individuiga	Neŭtra	
Nominativo	<i>iu</i>	<i>io</i>	<i>iuj</i>
Akuzativo	<i>iun</i>	<i>ion</i>	<i>iujn</i>
Genitivo	<i>ies</i>	–	<i>ies</i>
Prepozitivo	<i>je iu</i>	<i>je io</i>	<i>je iuj</i>

Rim. I. La genitivo estas uzata nur pri personoj, kaj preskaŭ nur singulare.

Iu kaj **io** povas esti uzataj kiel substantivoj, singulare kaj plurale; tiam ili estas determinitaj per apuda determinilo, kaj se temas pri **io**, la eventuala responda relativo havas la individuigan, ne la neŭtran formon: *se iu ion okupas (en la senco “prenas en posedon”), tiam en tiu momento la io estas okupata de la iu²; la io, kiun mi vidis...; lia potenco konsistas el diversaj ioj, el kiuj...²; sed kio estas la aldona io, pri kiu vi parolis?²*

Ajn

Se oni volas akcenti la nedefinecon, oni povas almeti al **iu** la adverbbon **ajn**: *ili deziras, ke ni faru iun ajn decidon²; kial ŝi forlasis tiun lokon, en kiu ŝi havis ian ajn eblon, por ion ajn laborenspezi?² punu min Dio, se mi antaŭ la sunsubiro gustumos panon aŭ ion ajn!².*

Rim. II. En tiu okazo, Zamenhof prefere uzis, kun **ajn**, la demandpronomojn: *la hundo pli sincere malĝojas je li, ol kiu ajn el liaj parencoj.*

Kvankam tia uzo estas pli emfaza, kaj apogas sin sur analogaj formoj en multaj naciaj lingvoj, estas tamen rekomendinde, pro klareco, rezervi kiu ajn nur por la okazoj, en kiuj tiu pronomo sekvigas suborditan verbon: *mi povos suprengrimpi sen la helpo de iu ajn; tio povus erarigi ĉiun ajn; la ŝlosiloj donas la eblon al ĉiu homo de iu ajn nacio tuj kompreni la skribafon; nian lingvon ĉiu povas libere uzi por iu (aŭ: ĉiu) ajn celo; sed: kiu ajn volas, tiu ankaŭ povas; la spertaj esperantistoj skribas per stilo preskaŭ simila, al kiu ajn nacio ili apartenas².* Kp. ankaŭ § 258, II.

Unu

Samsignifa kiel **iu** estas la pronomo **unu**. Ĝi havas nur unu formon, la individuigan, kiu, uzata kiel kvazaŭnomo, montras nur homojn: *unuĵ opinias tion, aliaj tion ĉi, kaj, kiel reprezentanto, montras indiferente homojn, bestojn, aĵojn: ĝi estas unu el la plej belaj hundoj.*

64

Nombroj	Singularo	Pluralo
Nominativo	<i>unu</i>	<i>unuĵ</i>
Akuzativo	<i>(unun)</i>	<i>unuĵn</i>
Prepozitivo	<i>je unu</i>	<i>je unuĵ</i>

Unu ne havas genitivon, kaj eĉ la singulara akuzativo estas ĝis nun neuzata; oni tiuokaze trovas tute mallogike la nominativan formon: *li fabrikis unu (= unun) el la plej belaj horloĝoj; mi ne scias la signifon de tiuj du vortoj, ĉar en la vortaro mi trovis nek unu (= unun) nek alian; kaj tiu nevarieco povas okazigi malklaraĵon: unu el viaj fratoj lasu ĉe mi!*^z (= unun!).

Rim. Tiu neregulaĵo venas de tio, ke **unu** estas samtempe numeralo (vd. § 86), kaj kiel tia, nevaria, dum plurale ĝi povas esti nur nedifina pronomo, kaj kiel tia, vari-
as. Sed tia konfuzo inter du malsamaj funkcioj ne pravigas la strangan formon de objekta nominativo; kaj nur la tradicio povis trudi tiun strangaĵon, ke **unu** havas, en la sama funkcio, akuzativon pluralan, sed ne havas akuzativon singularan.

Kiel kvazaŭnomo, **unu** estas uzata nur en korelativeco kun **alia**. Ankaŭ kiel reprezentanto ĝi ofte kuniĝas kun la sama pronomo. En tiu lasta okazo, kiam temas pri difinebla nombro da personoj aŭ aferoj, oni antaŭmetas la artikolon: *el tiuj lernantoj, la unuj scias sian lecionon, la aliaj ne; sed: inter lernantoj, unuj estas inteligentaj, aliaj ne.* Tamen, tio ne estas nepre deviga: *el ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj, aliaj estas malbonaj*^z.

NEAJ PRONOMOJ (NEGATIVOJ)

65

La *negativecon* oni esprimas per la pronomo **neniu**, kiu havas du formojn, sed nur unu nombron, la singularon. La *individuiga* formo, uzata kiel kvazaŭnomo, montras nur homojn: *ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu*^z; uzata kiel reprezentanto, ĝi sendistinge montras homojn, bestojn, aĵojn: *kiu ĉasas du leporojn, kaptas neniun*^z. La neŭtra formo uziĝas nur kiel kvazaŭnomo: *por nenio oni faras nenion*^z.

Neniu havas 4 kazojn:

Formoj	Individuiga	Neŭtra
Nominativo	<i>neniu</i>	<i>nenio</i>
Akuzativo	<i>neniun</i>	<i>nenion</i>
Genitivo	<i>nenies</i>	—
Prepozitivo	<i>je neniu</i>	<i>je nenio</i>

La genitivo, laŭ nia sperto, estas uzata nur pri personoj.

Nenio estas uzata ankaŭ substantive: *la absoluta nenio estas nekomprenebla.* Ĝi tiam estas difinita per apudaj determiniloj, kaj la respondebla rilativo havas la individuigan, ne la neŭtran formon: *ni falas ĉiuj en la nenion, kiun ni tiel timas.*

Rim. El tiu substantiva uzado sekvas, ke en kunmetoj la o-finaĵo povas esti ellasata: *neniigi, neniigi, nenifari* (sed male: *ĉiofarulo*).

* * *

66

Supre oni povis rimarki, ke inter multaj pronomoj ekzistas iaj formaj respondoj (individuiga formo per *-iu*, neŭtra per *-io*, genitivo per *-ies*

ktp.); ni montros ilin pli detale je la fino de la § 85. Tamen, ni povas jam rimarki: 1. ke tiuj respondoj ne estas ĝeneralaj (ili ne troviĝas ĉe **unu, alia, kelkaj, pluraj** ktp.); 2. ke eĉ ĉe la pronomoj, ĉe kiuj ili ekzistas, la uzado parte difektis ilin (signifo de l' genitivo ĉe **ies, nenies, ĉies**; neuzo de l' neŭtra formo kiel reprezentanto ĉe **io, ĉio, nenio** ktp.).

La celado al kompleta normigado de ĉiuj tiuj pronomoj ŝajnas do iom himera, ĉar eĉ ĉe tiuj, kiuj origine estis normigitaj, aperis, kun la tempo, nenormalaj esceptoj.

LA ADJEKTIVO

- 67** Oni distingas du specojn de adjektivoj: unuj servas por esprimi kvaliton, estmanieron apartenantan al iu aŭ io: *bela korpo*, *inteligenta furnalisto*; ili estas la **kvalifikaj adjektivoj**. Aliaj servas por esprimi ian rilaton aŭ determinon: *la infano dormas*; *la tuta mondo*; *kelkaj paĝoj* ktp. Ni vidis (§ 41), ke ankaŭ la pronomoj povas funkcii kiel determinantoj, kaj tiel akiri la valoron de adjektivo: *tiu knabo*; *kia laboro*? Ĉiujn ĉi adjektivojn oni nomas **determinaj adjektivoj** (= determinantoj).

Kelkaj adjektivoj estas uzataj kun ambaŭ valoroj: *certa* estas kvalifika en "*la sukceso estas certa*"; ĝi estas determina en "*certaj akademianoj laboras*". Distingas ilin nur la senco.

KVALIFIKAJ ADJEKTIVOJ

Divido

- 68** La kvalifika adjektivo finiĝas en Esp-o ĉiam per -a. Ĝi deklinaciĝas kiel la substantivo:

Nombroj	Singularo	Pluralo
Nominativo	<i>bela</i> (domo)	<i>belaj</i> (domoj)
Akuzativo	<i>belan</i> (domon)	<i>belajn</i> (domojn)
Prepozitivo	<i>je bela</i> (domo)	<i>je belaj</i> (domoj)

Ĝi neniam povas montri la sekson: *bela viro*, *bela virino*, nek la senseksan genron: *bela romano*.

Rim. Tamen en frazoj, kiel "*resti kun leono estas danĝere*" ni trovas kvazaŭ neŭtran formon de adjektivo; sed tio estas nur ŝajno, kaj la uzo de la adverbo venas de la fakto, ke la sola vorto, al kiu "danĝere" povas rilati estas la verbo "resti". Same kiel "bela kanto" fariĝas "bele kanti", el "bela estas la kanto" oni transponas "bele estas kanti".

Inter la kvalifikaj adjektivoj ni devas distingi du kategoriojn:

1. Tiuj, kiuj esprimas ian individuan, esencan econ de la koncernataĵo; ili devenas plejparte de adjektivaj aŭ verbaj radikoj (*bela, flava, loga, efika*); plus ĉiuj derivaĵoj per *-em, -end, -ind, -ant, -at, -int, -it, -ont, -ot*; esceptokaze, ili povas veni de substantivaj radikoj (*bombasta, fantazia*).

2. Tiuj, kiuj esprimas karakterizan cirkonstancon de la koncernataĵo, rilate al aliaj preparolaĵoj; ili devenas de substantivaj kaj adverbaj radikoj, ofte kun prefiksoj aŭ kunmetitaĵoj: *pastra domo, subtegmenta ĉambro, porĉiama amo*.

La uzado de ambaŭ kategorioj estas la sama, krom pri la tri sekvantaj punktoj:

a) la unuakategoriaj adjektivoj povas esti regule uzataj ĉe la komparacio: *domo pli granda ol la mia; plej bela, admirinda virino*. La duakategoriaj adjektivoj ne toleras la komparacion.

b) nur la unuakategoriaj adjektivoj povas esti substantive uzataj.

c) nur la duakategoriaj adjektivoj povas esti uzataj en kunmeto kun aliaj samspecaj, konservante sian finajn kaj ricevante ligstrekon: *rusa-japana milito*^z (Kp *grizflava, flavruĝa* ktp. Vd ankaŭ § 178 d). (G.W.)

Komparacio

Iu persono aŭ afero povas posedi kvaliton pli aŭ malpli ol alia ktp. Por esprimi tiujn gradojn en la kvalito, la lingvoj uzas specialan sistemon, la *komparacion*.

69

La komparacio havas du formojn, laŭ tio, ĉu oni taksas la gradojn de la kvalito en si mem (*komparacio absoluta*) aŭ oni taksas ilin rilate al alia komparata afero (*komparacio relativa*).

I. La *komparacio absoluta* esprimiĝas per diversaj rimedoj, kaj la gradoj estas tiel multaj, ke estus senutile distingi ilin:

70

a) per adverboj metitaj antaŭ la adjektivo: *li estas iom, malmulte, ete, normale, vere, multe, tre, ekstreme, treege, perfekte, terure, tute, tro, superhome, kiel eble plej stulta*.

Rim. En tiu rolo, oni ordinare ne uzas la artikolon antaŭ *plej*: *kiam la mizero estas plej granda, Dio estas plej proksima*^z.

b) per afiksoj almetitaj al la adjektivo: *duonvarma, dubearma, varmeta, varmega*.

c) per diversaj frazturnoj: *li estis tiel inteligenta! kiel bela ŝi estas!*^z; *ŝi estas bela, bela...*; *malriĉa kiel preĝeja muso*^z; *obstina kiel kapro*^z; *kresko mamuta, sed saĝo liliputa*^z; *nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo*^z; ktp.

d) per *tiom pli*: *oni poste tiom pli senzorge povas ripozi*^z; *ĉe la sensignifeco de la simptomoj, tiom pli granda atento devas esti turnata al la plendoj de la paciento*^z. En ĉi lasta ekzemplo, la komparataĵo estas iel esprimita, do ĝi estas jam transiro al la relativaj komparativoj (komparo paraleliga, Vd. § 262, 6).

II. La *komparacio relativa* enhavas du distingeblajn gradojn: la komparativon kaj la superlativon.

71

1. La *komparativo* signifas, ke la kvaliton iu aŭ io posedas pli aŭ malpli ol alia, aŭ samgrade kiel alia, aŭ ke el du kvalitoj iu, io posedas unu pli, malpli ol la duan, aŭ ambaŭ egale. Oni distingas do tri komparativojn: a) la *malsupereca* komparativo; ĝi esprimiĝas per la adverbo **malpli** metita antaŭ la adjektivo, kaj la komplementon enkondukas la vorto ol: *li estas malpli riĉa ol mi; li estas malpli inteligenta ol ruza.*

Rim. Estas ĝene, ke la adverbo de tiu malsupereca komparativo estas kunmetita: la akcento falas sur la prefikso **mal**, kaj la renkontiĝo kun samprefiksa adjektivo estas fojfoje konfuzodona: *malpli malfermita, mi petas!* (kaj se la substantivo same komenciĝas: *malpli maldolĉa malfeliĉo...!*). Kurioze, la internacia formo kaŝe troviĝas en la Fundamenta almenaŭ (al-men-aŭ).

b) la *egaleca* komparativo: ĝi esprimiĝas per unu el la adverboj *tiel, samgrade, same, egale* metitaj antaŭ la adjektivo, kaj la komplementon enkondukas la vorto **kiel**: *li estas tiel riĉa, kiel mi; ŝi ŝajnas tiel bela, kiel stulta; tio estas same maloportuna, kiel tio ĉi.*

Alian specon de egaleca komparo esprimas la dirmanieroj: *kia patro, tia filo; ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko*².

c) la *supereca* komparativo: ĝi esprimiĝas per la adverbo **pli** metita antaŭ la adjektivo, kaj la komplementon enkondukas la vorto ol: *li estas pli riĉa ol mi; ŝi estas pli ordonema ol orodonema.* La gradon de la supereca kaj malsupereca komparativo oni povas malpliigi per **iom**: *ĉi tiu vino estas iom pli bona*; kaj pliigi precipe per **multe** (neniam per **tre!**): *ŝi estas multe pli bela ol ŝia fratino*; sed ankaŭ per aliaj adverboj: *konsiderinde, ankoraŭ, eĉ.* Precipe emfaza estas la ekkria **kiom**: *kiel bela estas via amo, kiom pli bona estas via amo ol vino!*²

La egalecan komparativon oni plifortigas per la adverboj *ĝuste, ekzakte, matematike* ktp.

Rim. La suplementon, kiu esprimas la grandon, per kiu diferencas la komparitajoj, oni montras per **je**: *mi estas je unu jaro pli juna ol vi*². Ankaŭ akuzativo estas uzebla. (Kp. § 144. 1 kaj 207).

72

Ĉe la *komparacio relativa*, rimarkinda estas la uzado de la komparativo anstataŭ superlativo, kiam la komparo koncernas nur du aferojn. Tio estas logika, ĉar inter du aferoj, se unu estas ekzemple pli granda ol la alia, ĝi estas samtempe la plej granda el la du. En tiu okazo, oni distingas tamen tiun superlativ-signifan komparativon disde la ordinara komparativo per la antaŭmeto de la artikolo; komparu: *ŝi estas pli juna ol ŝia fratino* kun: *ŝi estas la pli juna.*

Dank' al tiu forma distingo, oni ne bezonas esprimi, ke temas pri du aferoj: *la pli forta el la manoj* (ne: *el la du!*). Kiel oni vidas, la komplementon enkondukas el, kiel ĉe la ordinara superlativo.

Rim. En pluraj lingvoj oni uzas la formon de la relativa komparativo kun signifo de absoluta komparacio: tio ne estas ebla en Esp-o. Por traduki tiun nuancon, oni povas uzi du metodojn:

a) pozitivan, antaŭmetante al la adjektivo la adverbojn: **iom, ete, kelke, meze, pli ol iom, pli malpli**: *la forno estis iom varma, sed ne varmega; ŝi estas ete riĉa; li*

ŝajnis kelke hezita; homo meze kulturita; libro pli ol iom interesa; pli-malpli frue oni certe rekonos tion. Oni povas uzi ankaŭ la sufikson *-et*: *beleta knabino*.

b) negativan, antaŭmetante la esprimojn *ne mal-*, *ne tro mal-*, *ne sen*: *tio estas ne malgrava informo; li estas ne tro inteligenta* (= iom stulta); *ŝi estas ne sen riĉaĵoj*.

Tiu negativa maniero estas ofte preferinda. Sed oni evitu, malgraŭ pluraj ekzemploj ĉe Z., la adverbbon *sufiĉe*, kiu ne havas propre tiun signifon (*sufiĉe... por!*), kaj la kunmetitaĵon *treete*, kiu ŝajnas signifi ĝuste la malon (*tre ete*).

2. La *superlativo relativa* esprimas, ke iu, io posedas kvaliton pli aŭ malpli ol ĉiuj aliaj. Tiun ideon oni esprimas per la adverbo *plej* aŭ *malplej*, metita antaŭ la adjektivo kaj akompanata de la artikolo (Kp. § 70. a. Rim.); la suplementon enkondukas la prepozicio *el*, kiam tiu suplemento montras aferojn samnaturajn kiel la kvalitoposedanto: *li estas la plej riĉa el ni ĉiuj*; *tio estas la malplej bona tasko el la ĝis nun korektitaj*; aŭ la prepoziciaĵo *el inter*: *li estis la plej bela el inter la homidoj^z*.

Kiam la suplemento montras kolektivon (aŭ kolektivejon), ĝin enkondukas la prepozicio *en* aŭ *sur*: *li estas la plej riĉa homo en la mondo*; *tiu varo estas la plej profitodona sur la merkato*; *vi estas la malplej estiminda ulo sur la tero*.

Por akcenti la superlativon, oni aldonas la adverbbon *multe*: *li estas la multe plej fama verkisto en sia lando*.

Substantiva uzado

Pri la *substantiva uzado*, oni devas rimarki, ke ĝi estas ne tre ofta. Regulan substantivigon de adjektivo oni ricevas en Esp-o per la afiksoj *-ul*, *-ulin*, *-aj*, *-ec*. Tamen, pro imito al nacilingvoj kaj por faciligo de la frazo, oni trovas ĉe bonaj verkistoj adjektivojn uzatajn kun la funkcio de substantivo. Tiun funkcion ili povas akiri aŭ pro subkompreno de antaŭe esprimita substantivo: *amaso da fianĉoj, sed la ĝusta ne venas^z; ĝi havis sufiĉe da floroj por konsiderado. Tie staris riĉaj kaj malriĉaj, eĉ kelkaj tre malriĉaj^z; la pomarbo estas la plej ĉarma, kiun oni povas vidi*; aŭ pro subkompreno de nenie esprimita substantivo (*ulo, ulino* aŭ *aĵo*).

Subkomprenon de *ulo, ulino*, t.e. substantivan uzon de adjektivo por montri personojn oni trovas:

a) kun determinantoj: 1. en kelkaj interjekciaj formuloj: *mia bona!^z mia kara!^z bonan tagon, miaj plej amataj!^z kia malsaĝa!^z ha! la senhonta!^z* 2. en kontinua parolo, kun adjektivoj signifantaj homkunvenan kvaliton; ili estas plejofte determinataj per artikolo, montra aŭ poseda adjektivo: *kiu volus elportadi la premon de l' potencaj, la ofendojn de la fieraj^z la malfeliĉa vagas nun sub tero^z; tiuj fortaj, ŝi pensis, tiuj kapablaj, tiuj feliĉaj dividiu tion, kion la mondo al ili donas, kun mi!^z al ĉiuj estas la sama sorto, al la virtulo kaj al la malvirtulo, al la bona kaj pura kaj al la malpura^z; la malfortajn vi ne flegas, malsanan vi ne kuracas, vunditan vi ne bandaĝas, forerarintan vi ne revenigas, perditan vi ne serĉas^z; ĝi estas ni, viaj fidelaj!^z mia maljuna, kun sia karaktero, ne po-*

73

74

vas longe vivi sur la sama loko^B; de ĉiuj najbaraj vilaĝoj kaj urboj venis multe da scivolaj aŭ pija^B;

b) sen determinantoj, precipe en sentencoj aŭ proverboj: *sangavidan kaj malican Dio abomenas^Z; ne kredas ŝtelisto, ke honestaj ekzistas^Z; sata malsatan ne povas kompreni^Z;* sed ankaŭ ĉe participoj, kio ebligas la uzon de akuzativa suplemento: *venigantaj la libron rekte de la aŭtoro por la transsendo ne pagas^Z;*

c) en la virinaj propraj nomoj (Kp. § 36).

En ĉiuj tiuj okazoj oni devas zorgi, ke la kunteksto klare komprenigu, ke temas pri *ulo*, ne pri *aĵo*. Ĉar plejofte la adjektivoj substantive uzataj montras aĵojn. Oni trovas tiajn:

aa) kun determinantoj, en la ordinara prozo: *konformigante al kutimo, vi flatas al ia malbona, mi ne scias precize kia, sed certege malbona^Z; mi devis oferi la agrablan pro la utila^Z; multon da bona kaj feliĉa mi ĝuis en vi, hejma domo!^Z du homoj manĝis salmon, kaj ankoraŭ multe da alia^Z; mi legas al vi nur la plej delikatan^Z; ĉiu estis ravata de la nova kaj bela, kion ŝi vidis^Z. (Kp. ĉi-supre).*

bb) sen determinantoj, en sentencoj aŭ proverboj: *prokrastita ne estas perdita^Z; ne bela estas amata, sed amata estas bela^Z (= nur la amataĵon oni trovas bela); plibona estas malamiko de bona^Z.*

DETERMINAJ ADJEKTIVOJ

75 Determini substantivon oni povas en diversaj manieroj:

a) Oni tre precize montras, pri kio temas: *la viro, kiu ĵus salutis min...; ĉi tiu libro*. Tio estas la **d e t e r m i n o d i f i n a**.

b) Oni esprimas, ke io estas nek konata, nek antaŭe priparolita: *arboj staras apud la vojo; mi ricevis leteron; subite eliris homo*. Ĝi estas la **d e t e r m i n o n e d i f i n a**.

Sed tiun nedifinecon oni ofte bezonas nuanci, aŭ por malpliigi ĝin, precizigante malĉefan detalon, aŭ por pligravigi ĝin, insistante pri ĝia kompleto. Tiam oni uzas unu el la tri sekvantaj rimedoj:

1. Oni aludas ies kvaliton: *multaj homoj; certaj libroj; ia birdo*. Tio estas la **d e t e r m i n o k v a l i t a**.

2. Oni indikas, ke oni elektas la objekton el pli-malpli difinita grupo, el limita nombro da similaj objektoj: *ĉiuj miaj duboj; iu mia amiko; iu poemo de Heine*. Tio estas la **d e t e r m i n o e l e k t a**.

3. Oni indikas, ke la objekto apartenas, almenaŭ en nia konscio, al nenia difinita grupo: *ia amiko; nenia libro*. Tion, ĉar ĝi ne nur ne difinas, sed rekte insistas pri nedifineco, oni povas nomi **d e t e r m i n o m a l d i f i n a**.

Por esprimi ĉi tiujn specojn de determino, la lingvo posedas certan nombron da **d e t e r m i n a j a d j e k t i v o j**, kiuj aperas sub diversaj formoj: unu el ili, la artikolo, estas nevaria; kelkaj estas puraj adjektivoj (*multa, kelka, certa*); kelkaj havas la formon de prepoziciaĵo (*multe da,*

tiom da); fine tie ĉi klasiĝas ankaŭ la formoj respondaj al la individuiga formo de la tabelpronomoj (*iu, tiu, kiu, ĉiu, neniu*) kaj la a-finaĵa tabelserio (*ia, tia, kia, ĉia, nenia*).

La uzado de tiuj diversaj adjektivoj por esprimi la diversajn determinokazojn ne prezentas malfacilojn, krom pri la determino maldifina, por kiu ne ekzistas aparta esprimo: tial la uzado hezitas inter la u-formo kaj la a-formo. Ni montros sube, ke laŭ la Z-a uzado, la a-formo estas tiam elektinda.

Fine, laŭ ilia senco, oni klasas determinajn adjektivojn: posedaj, montraj, rilataj, demandaj, kolektivaj, kvantaj, nedifinaj kaj neaj. La artikolon, kiu proprasence estas montra determinanto, ni metas unualoke, pro ĝia aparta graveco kaj ampleksa uzado.

LA ARTIKOLO

La ĉefa rimedo por determini substantivon estas la artikolo.

76

La *artikolo* havas la formon *la*, varian nek laŭkaze, nek laŭgenre, nek laŭnombre; ties similo kun la adjektiva finaĵo estas nur parta. Akcesora formo estas *l'*: teorie oni povas uzi ĝin ĉie, kie ĝi estas prononcebla: *por reunuigi l' homaron*². Praktike oni kutimas pli kaj pli forlasi ties uzon en la ordinara prozo. En la artprozo kaj en poezio, oni uzas ĝin preskaŭ nur post prepozicio vokale finiĝanta: *ĉe l', pri l', pro l'* – sed precipe post *de*, kun kiu ĝi fariĝas iel kunmetitaĵo. Oni male evitas uzi ĝin antaŭ vokale komenciĝanta substantivo, parte pro timo al miskomprenoj (*l' afero = la fero; l' avo = lavo*), parte pro tio, ke en tia pozicio la sono de *l'* ne estas sufiĉe grava por elvoki la ideon pri artikolo. En la poezio, oni uzas la apostrofadon ankaŭ post vokale finiĝantaj subjunkcioj: *ke l' homo; se l' virino; kvazaŭ l' viro...*

La artikolo estas determinilo, kiu servas por klarigi la frazon, precizigante, ke la preparolato estas konata de la aŭskultanto, kaj evitigante al li konfuzon kun alia, alispeca preparolato; alidire, ĝi estas speco de malforta demonstrativo. Ĉar tiu nocio de konateco estas io tro ĝenerala, ol ke ĝi sufiĉus por la solvado de ĉiuj duboj (cetere Kp. § 85, Rim. I. 1), ĉar la distingo inter determineco kaj aluditeco, kiun V. Setälä volas substitui al ĝi, restos neklara por la ordinaraĵ legantoj, kaj ĉar pri kelkaj punktoj la uzado ne estas ankoraŭ fiksita, ni preferas doni ĉi-sube detalan analizon de la diversaj okazoj.

Rim. I. Pro tiu demonstrativa senco, de Saussure iam uzis la artikolon anst. *tiu(j)*, *tiu(j)n* antaŭ rilatpronomo: *oni kaptis la, kiuj prirabis la butikon*. Sed tiu uzado same ne enradikiĝis, kiel ti-kiuj proponita de Lanti.

Principe oni uzas la artikolon nur ĉe la substantivoj. Ni esploros aparte ties uzadon kun la aĵ- kaj ad-substantivoj. Poste ni studos la okazon ĉe la propraj nomoj.

A. Kun la aĵ-substantivoj, la artikolo havas tri difinitajn signifojn:

1. ĝi indikas, ke la ulo aŭ aĵo, esprimita de la substantivo, estas konata,

aŭ ĉar oni jam preparolis ĝin, aŭ ĉar ĝi kuŝas antaŭ la okuloj, aŭ ĉar la cirkonstancoj ne allasas eblecon de konfuzo pri ĝi: *fine mi mendis la robon*, mi diras al la edzino, kiu jam tamburis sian deziron sur miajn orelojn; sed: *mi aĉetis ĉapelon*, diras ŝi, kiam ŝi abrupte decidis tiun (bedaŭrindan) elspezon. *Donu al mi la panon*, mi petas de la infano, kiam ni sidas ĉe la tablo, kaj ambaŭ bone vidas, pri kiu pano temas; sed: *donu al mi panon*, mi petas de la vendisto, ĉar temas pri ia ajn pano. *Kie estas la gazeto?* mi grumbas ĉiuvespere, kaj neniu en la hejmo eraras, ĉar ĉiu scias, ke ne la hieraŭan aŭ antaŭhieraŭan mi petas, sed la hodiaŭan; sed: *Kie estas gazeto?* petas la servistino, kiu bezonas paperon por ekbruligi la fajron, ĉar ĉiu ajn ĵurnalo taŭgas por tiu funkcio.

Se oni dubas pri la uzindeco de la artikolo en tiu okazo, oni provu, ĉu oni povas, sen ŝanĝi la sencon, anstataŭigi ĝin per tiu: se jes, oni uzu la artikolon. (K.F. § 33 C).

Rim. II. Aparta okazo de la supra regulo estas la uzado de la artikolo anstataŭ la poseda adjektivo, speciale por montri korpoparton aŭ veston: *elpiki al iu la okulojn²*; *li rompis al si la kapon*; *gentile li levis la ĉapelon*.

2. ĝi indikas, ke la sekventa substantivo esprimas, se ĝi staras en singularo, ulon aŭ aĵon konsideratan ne kiel individuon, sed kiel reprezentanton de sia tuta klaso aŭ kategorio; se ĝi staras en pluralo, la tutajon de la samklasaj uloj aŭ samkategoriaj aĵoj: *la historio estas pli arto ol scienco* (sed: *rakontu al mi belan historion*); *la papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka²* (sed: *blanka papero kuŝas sur la tablo²*); *la amaso juĝas per okulo²* (sed: *sur la placo svarmis amaso da homoj*); *la soldatoj iras pli por la nomo ol por la profito²* (sed: *soldatoj iris atake en disa ordo*); *oni elhakis la arbojn apud la vojo* (sed: *oni elhakis arbojn* – ne ĉiujn – *apud la vojo*); *unu el la verkistoj anoncis, ke la virinoj malsanas fizike kaj morale kaŭze de tio, ke al ili mankas granda amo (kompreneble, koncerne la viron)²*.

Se oni dubas pri la uzindeco de la artikolo en tiu okazo, oni provu, ĉu oni povas, sen ŝanĝi la sencon, anstataŭigi ĝin per ĉiu, ĉiuj aŭ la tuta: se jes, oni uzu la artikolon.

Rim. III. Kun la nomoj de abstraktaĵo kaj de materialo, oni povas ne uzi la artikolon: *lakto estas pli nutra ol vino²*; *vitro estas rompebla kaj travedebla²*; *malfeliĉo ofte kunigas la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin²*. Sed se ili estas determinitaj per adjektivo aŭ prepozitivo, oni devas uzi la artikolon: *la fero el Svedujo estas bona*; *la grandaj malfeliĉoj estas silentaj*.

3. ĝi indikas, ke la ulo aŭ aĵo esprimita de la substantivo, estas sola, unika en sia speco: *la suno, la tero, la ĉielo, la infero; la filo de la reĝo ŝin renkontis²* (ĉar estas nur unu filo; se estus pluraj, oni devus diri: *filo de la reĝo* aŭ *unu el la filoj de la reĝo*; la staras antaŭ reĝo pro la 1a motivo; evidente temas pri la reĝo de la koncerna lando; se estus ia alia, oni dirus *filo de reĝo* la unuan fojon, kaj *la filo de reĝo* la sekvantajn); *li estas la Esperanta poeto* (= tiel eminenta, ke nur li povas pretendi tiun titolon. Sed: *li estas Esperanta poeto* = unu inter pluraj).

Se oni dubas pri la uzindeco de la artikolo en tiu okazo, oni provu, ĉu oni povas, sen ŝanĝi la sencon, almeti post ĝi **sola** aŭ **unika**: se jes, oni uzu la artikolon.

Rim. IV. Kiam aĵ-substantivo estas determinita per epiteta rilata subpropozicio, ĝi ne devige alprenas la artikolon, kiel erare opinias multaj slavoĵ; oni almetas la artikolon nur, kiam ĝi havas unu el la tri ĉi-supre montritaj signifoj: *li ne havas plu la* (= tiun) *ringon, kiu kostis tian grandegan sumon; la (tuta) homaro, kiu naskis tiom da genioj, ne kapablas elpensi rimedon por eternigi la pacon; ktp.* Sed oni dirus: *li aĉetis ringon, kiu kostis grandegan sumon; homaro, kiu ne kapablas starigi pacon, ne indas vivi plue.*

B. Kun la ad-substantivoj oni uzas la artikolon en la du okazoj studitaj ĉi-supre sub 1. kaj 2.:

1. *ĉu vi aŭdis la krimon? mi ne komprenis la aludon; fininte la skribadon, li donas la paperon^z.*

2. *la kantado estas agrabla okupo^z.*

kaj krome en tria okazo:

3. kiam la ad-substantivo estas determinita per de-prepozitivo: *la hirundoj anoncas la alvenon de printempo; min tre ĉagrenas la perdiĝo de tiu letero; min tre ĉagrenus la perdiĝo de letero; la irado de la aferoj^z.*

Rim. V. Male, kiam la ad-substantivo estas determinita per rilata subpropozicio, la artikolo ne estas deviga: ĝi dependas de la samaj kondiĉoj, kiel ĉe la aĵ-substantivoj (Vd. ĉi-supre Rim. IV.): *vi ricevos de li la* (= tiun) *instruon, kiun vi bezonas* (= la bezonatan instruon); *vi ricevos de li instruon, kiu estos valora* (= instruon valoran).

Rim. VI. Oni *ne* uzas la artikolon en la sekvantaj okazoj:

1. se oni povas, sen ŝanĝi la sencon, antaŭmeti al la substantivo la adjektivojn *iu, ia, kelka, kelkaj, multaj, pluraj, unu, certa.*

2. post *da, ĉiu, ĉiuj, ambaŭ, kies, ties* (sed jes antaŭ *tuta* kaj *ceteraj!*).

3. antaŭ la posedaj adjektivoj: *mia, ĝia, nia* ktp. (Vd. § 79. Rim. II.).

4. antaŭ infinitivo aŭ adverbo.

5. antaŭ vokativo: *ĉu vi venas, patro?*

Rim. VII. En la Ekzercaro Zamenhof skribis: "La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo, ... povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna, sed ne necesa." De tiu komenca tolero restas hodiaŭ du kampoj, en kiuj ĝi plu aplikiga:

a) en proverboj, maksimumaj kaj difinoj: *malriĉeco ne estas malvirto^z; leĝo pasintaĵon ne tuŝas^z; diletanteco estas amuzilo de la vivo^z.*

b) en la poezio, kiam la ĉeesto de la artikolo ĝenus la ritmon: *kaj rapide kreskas la afero – per laboro de la esperantoj^z (= per la laboro); haltis knabo en kantado^z (la knabo en la kantado); en tombo mi estas tenata^z (Kp. la originalo: *Ich liege ja im Grabe*).*

Rim. VIII. La nomoj de parenceco, kiam uzataj en la familia rondo, estis akompanataj de la artikolo ĉe Zamenhof: *diru al la patro, ke mi estas diligenta; mi venas de la avo kaj mi iras al la onklo.* Nun, konforme al la ĝenerala uzo en la okcidentaj lingvoj, oni tendencas rigardi tiujn nomojn en tia uzo kiel kvazaŭ proprajn nomojn, kaj uzi ili sen artikolo: *diru, ĉu patrino venos kun ni atendi patron ĉe la stacidomo?* En tiaj okazoj, oni preskaŭ povus skribi tiujn nomojn per majusklo.

Ĉe la propraj nomoj

I. kiam ili staras solaj, oni principe ne uzas la artikolon, ĉar ili estas per si mem sufiĉe determinitaj. Do oni skribas *sen artikolo* la nomojn de:

1. persono: *kaj Adamo donis al sia edzino la nomon Eva*^Z.

Rim. I. Ecepton faras la komunaj nomoj uzataj kiel propraj: *la Fortuno*^Z. Sed ankaŭ ili povas esti uzataj sen la artikolo: *sur la ĉapo de Fortuno ni ne estas la pinto*^Z.

2. lando: *mi revenigos la forkaptitojn de Judujo*^Z; *la junaj loĝantoj de Ameriko*^Z.

3. urbo: *ili starigis tendaron en Gilgal, oriente de Jeriĥo*^Z.

4. maro: *ili trapasis Mediteraneon; oni veturas al Bosforo*^Z.

5. rivero: *kaj la kvara estas Eŭfrato*^Z; *oni venigadis rikoltaĵojn de Nilo*^Z; *koridoro, sur kies fundo fluas Nilo*^B; *Tamizo, Danubo, Rejno ankoraŭ ruliĝas*^Z.

6. monto: *veniĝu cedrojn de Lebanon*^Z; *Elija suriris sur la supron de Karmel*^Z; *li ekiris la vojon tra Himalaĵoj al Tibeto; riĉa hotelo sur la supro de Olimpo*^Z; *Hekla estingiĝis*^Z.

Rim. II. Se la maro, rivero aŭ monto estas nomataj nur per individuiga, sed komunsignifa adjektivo, oni uzas la artikolon: *la Ruĝa Maro*^Z; *la Norda Maro*^Z; *la Blua Rivero*; *la Monto Blanka* (sed: *Ĝeneva Lago*, sen artikolo).

7. festoj: *Epifanio, Anunciacio, Fastomezo, Pasko, Ĉieliro de Kristo, Pentekosto, Ĉieliro de Maria, Kristnasko, Ramadano*. Sed oni trovas esceptojn: *la Pasko*^Z; *la Pentekosto*^Z.

Rim. III. Kiam la festo ne estas nomata per la nomo de la okazintaĵo, sed per la nomo de rilata detalo (objekto, persono, dogmo), oni uzas la artikolon: (*la tago, festo, dimanĉo de*) *la Tri Reĝoj, la Palmaĵoj, la Unua de Majo, la Triunuo, la Kristokorpo, la Mortintoj, la (senpeka) Koncipiteco de Maria; la Sankta Johano*^Z, *la Sankta Ludoviĝo, la Sankta Silvestro* (oni diras ankaŭ: *la tago de Sankta Johano kaj la Johana tago*). Konfuzo ne povas okazi kun la persono de la sanktulo, ĉar en tiu okazo, ne ĉeestus la artikolo (vd. sube, Rim. IV.) En (*la tago de*) *Ĉiuj Sanktuloj* ne ĉeestas artikolo pro la uzo de *ĉiuj*. Same, kiam oni signas preĝejon per sanktul-nomo, oni uzas la artikolon: *de la Farunpesilo ĝis la Sankta Bartolomeo*^Z.

La du vortkategorioj, pri kiuj ekzistas dubo, ĉu oni devas rigardi ilin propraj nomoj aŭ ne (vd. § 39. a kaj b), ne estas same traktataj laŭ la uzado de la artikolo:

a) la nomoj de tempodividoj, kvankam ordinare skribataj per komenca minusklo, ĝenerale ne toleras la artikolon: *Januaro estas la unua monato de la jaro*^Z; *hodiaŭ estas sabato*^Z; *kaj estis vespero, kaj estis mateno, la dua tago*^Z; *jam sonis noktomezo*.

Notinde estas, ke la tekston *de l' mateno ĝis la vespero* (1888) Z. poste korektis je *de mateno ĝis vespero*.

Tamen, antaŭ la sezonomoj, li uzis artikolon, kiam ili funkcias kiel subjektoj de ago-signifaj predikatoj: *nun komenciĝis la vintro; jen aperis la printempo; venis la vintro* ktp. Male, ĉe stat-verboj (esti, fariĝi ktp.), li preterlasas la artikolon: *kaj estis printempo kaj fariĝis somero, kaj*

estis aŭtuno kaj fariĝis vintro; kiel adjektoj, ili staras ankaŭ sen artikolo: *tiujn fabelojn ni aŭskultos en vintro^Z; en somero ni veturas per diversaj veturiloj^Z.*

b) la popolnomoj, male, povas laŭbezone akcepti la artikolon, kaj sekve ne estas traktataj kiel propraj nomoj: *la francino^Z; la Ĥaldeoj^Z* ktp.

c) la titoloj de societo prezentas kuriozan okazon: kiam ili estas normale skribitaj, ili laŭbezone akceptas la artikolon; sed, kiam oni signas ilin per la komencaj literoj, oni emas trakti ilin kiel proprajn nomojn, kaj oni forigas la artikolon. En la jarlibro de U.E.A. 1936, ni legas (pĝ. 13): *la 1. de novembro la Universala Esperanto-Asocio komencis... Jam la "Interkonsento de Kolonjo"... donis novan konstitucion al U.E.A.... La movado, en kiu U.E.A. ricevis rolon... Same oni diras S.F.P.E., sed: la Societo Franca por Propagando de Esperanto* ktp.

d) la titoloj de la klasikaj verkoj regule alprenas la artikolon: *la Eneido, la Odiseado, la Biblio, la Korano* ktp. Male tiuj de la modernaj preskaŭ neniam: *Streĉita Kordo, Naciismo, Kvaropo, Prozo Ridetanta, Pinta Kraĵono, Koko krias jam* ktp.

e) la orientpunktoj estas komunaj nomoj kaj alprenas la artikolon: *la sudo, la okcidento.*

II. Kiam la propraj nomoj estas akompanataj de epiteto, oni uzas la artikolon: *Ludoviko la dekkvara; Frederiko la granda; la proksiman ĵaŭdon^Z; la venonta dimanĉo^Z; la larĝa Danubo^Z; la bona Dio^B; la tuta Italujo^Z.*

III. Kiam la propraj nomoj estas nomesperimoj kun anoncvorto, oni uzas la artikolon antaŭ ĉi lasta: *la rivero Gango^Z; la monto Karmel^Z; la profeto Mahometo^Z; la arabo Geŝem^Z; la pastro Ezra^Z; la reĝo Salomono^Z; la reĝino Ester^Z; la vic-reĝo Sargon^B; la princo Ramzes^B; la kanceliero Seguier^B.*

Rim. IV. Ecepton faras nur malmultaj honoraj alnomoj, kiuj kvazaŭ kunkorpiĝas kun la propra nomo: *Sinjoro, Sinjorino; Fraŭlino, Doktoro, Profesoro, Sankta, Beata* (en religia senco): *Doktoro Zamenhof; Sankta Petro.* Sed se tiun alnomon kvalifikas adjektivo, ĝi iel disiĝas de la propra nomo kaj la artikolo reaparas: *la genia doktoro Zamenhof.* Kompreneble, kiam tiun alnomon sekvas ne propra nomo, sed titolo, oni uzas la artikolon: *li ne scias, ke sinjoro la vicgrafo kaj ŝi estas nun kune^Z*; sed la artikolo foriĝas ĉe alparolo: *saluton, sinjoro rabeno.*

Rim. V. Ĉe la nomoj de ŝipoj, gastejoj ktp., kie la komuna alnomo estas ordinare subkomprenata, oni tamen uzas la artikolon: *li ekloĝis en la Tri Cervoj; li veturis per la Titanic.*

Fine la artikolo servas ankaŭ kiel simpla *gramatika ilo*, preskaŭ perdante sian propran signifon. En tiu rolo ĝi servas:

1. por montri, ke adjektivo estas substantive uzata: *la Ĉiopova^Z* (vd. § 74. a); *hodiaŭ estas la dudeksepa de Marto^Z* (vd. § 87 B Rim.).

2. por montri, ke adverbo aŭ tia vorto estas substantive uzata: *la "tuj" de sinjoroj estas multe da horoj^Z*;

3. por montri, ke propra nomo estas uzata kiel komuna: *Katarina, la*

Semiramis de Rusujo; li estas la Herkulo de l' vilaĝo.

4. por transformi absolutan superlativon en relativan: *ŝi estas la plej bela el ĉiuj* (vd. § 70 Rim., 73).

5. por transformi komparativon en superlativon: *la pli forta el la manoj* (vd. § 72).

6. por transformi posedan adjektivon en pronomon: *tiu libro estas la mia* (vd. § 51).

LA PRONOM-ADJEKTIVOJ

Posedaj adjektivoj

79 Determini substantivon oni povas ankaŭ per adjektivoj montrantaj la apartenecon: *mia, via, ŝia, ĝia, nia, via, ilia*. Tie ĉi oni povas menciigi ankaŭ la formojn *kies, ties, ies, ĉies, nenies*, kiuj montras same la apartenecon. Sed, ĉar ili estas samtempe ankaŭ reprezentantoj aŭ kvazaŭnomoj (genitivaj de *kiu, tiu, iu, ĉiu, neniu*) ni pritraktis ilin tie (vd. §§ 52-65).

La posedaj adjektivoj povas esti kombinitaj kun aliaj determinantoj: *unu mia konato; iu mia amiko; lia unua verko; ĉiu ilia klopodo; tiuj niaj samideanoj; kelkaj liaj libroj; du miaj artikoloj*.

Rim. I. En tiu okazo oni povas uzi ankaŭ la turnon: *unu el miaj amikoj; la unua el miaj verkoj...* kun tamen iom diferenca signifo: *lia unua verko* ne precizigas, ĉu la aŭtoro faris ĝis nun tiun verkon aŭ ankaŭ aliajn; *la unua el liaj verkoj* precizigas, ke li jam faris plurajn aliajn.

Rim. II. En poezio oni trovas ofte la artikolon uzata antaŭ la poseda adjektivo: *ho la profeta mia antaŭsento!*² *Ereras for la penso mia...*²; *vane perdiĝos la voko via ridata*². Oni rimarkos, ke Zamenhof ne metas la artikolon tuj antaŭ la poseda adjektivo; cetere plej ofte oni trovas la artikolon post la grupo: posedajektivo + substantivo, por enkonduki atentindan adjektivon: *kun sia karaktero la sincera li ne esploras la rapirojn*². Tiun stilefeton oni devas ne trovi.

Ĉe la tria neŭtra persono, oni povas heziti inter *ĝia* kaj *ties*, kiuj estas preskaŭ sinonimaj; diferencon enmetas nur la kutimo klarigita sub § 53. A. 2.: oni prefere uzas *ties* por resendi al persono aŭ afero, kiu ne estas la subjekto de la antaŭa propozicio: *la infano ludadis kun sia pupo, kaj subite ties kapo* (= pupa) *frakasigis* (sed: *ĝia kapo* = infana).

Rim. III. Pri singulara poseda adjektivo ĉe pluraj determinataj substantivoj vd. § 128. Rim.

Montraj adjektivoj

80 Montraj adjektivoj estas *tiu* kaj *tia*.

Tiu kaj *tiu* ĉi rekte almontras ion, elektante ĝin el pluraj similaj: *tiu homo, tiu ĉi domo*.

Rim. I. Ĉar la propraj nomoj prezentas mem ion klare identigitan, ili ne bezonas antaŭ si montran adjektivon; kiam tio okazas, la demonstrativo akiras tiam nuan-

con aŭ de ŝato: *tiu Hanibalo, kiu tremigis la Romanojn, estas nun manpleno da polvo* – aŭ de maŝato: *pri tiu Moseo..., mi ne scias, kio fariĝis kun li!*^{Z.} (G.W.)

Tia montras kvaliton: *kion vi farus en tia okazo?*^Z *mi ne amas tiajn parolojn*^Z.

Ĉe la montraj pronomadjektivoj ne ekzistas determino maldifina (vd. § 75); fakte, oni almontras aŭ ion solan, aŭ ion troviĝantan inter objektoj vidataj, do nombre limitaj per tio, ke oni vidas ilin. Sekve, kiam ne temas pri kvalito, oni povas uzi ĉiam la u-formon.

Kiam la rilata subprop-o esprimas kvaliton, oni povas determini la reprezentaton per **tia**, eĉ korelative kun **kiu**: *tiaj argumentoj, kiuj estas plenigitaj per multo da citaĵoj*^Z.

Rim. II. Se la substantivo, al kiu **tia** montras, havas epiteton adjektivan, **tia** rilatas al tiuj ambaŭ kune: *kion vi farus en tia danĝera situacio?* La epiteton tiaokaze oni primontras per **tiel**: *mi neniam vidis tiel stultan homon*. Tiu distingo, tamen, ne ĉiam estas farata: *ne skribu al mi tiajn longajn leterojn*^Z.

Rim. III. Apud la formo **tia** Zamenhof plurfoje uzis la preskaŭ sinoniman **tiela**: "se brulas granda domo, kaj la brulo estas stranga, jen hela, jen subite estingiĝanta por momento, jen saltanta ktp. – ni povus diri: *ĉu vi vidis tiun brulon?* (la brulon de tiu ĉi domo). *Tian brulon* (tiel grandan, ktp.) *mi ofte vidis, sed neniam mi vidis brulon tielan* (tiamanieran)" (Z). Tamen, tian distingon oni nuntempe ne faras, kaj en la supra ekzemplo oni uzus prefere la parentezajn formojn.

Rim. IV. Pri ĉi anstataŭ ĉi tiu(j) vd. § 54. Rim. II.

Rilata adjektivo

81

La rilata adjektivo estas **kiu**.

Ĝi formiĝas propre el la rilativo **kiu** tiamaniere, ke ĉi tiu fariĝas la epiteto de tiu vorto, kies reprezentanto ĝi estas: *hundo, kiu bojas, ne mordas* = *kiu hundo bojas, tiu ne mordas*; *kiun poemon vi ne parkeris perfekte, tiun ne deklamu* (= tiun poemon, kiu...).

Oni trovas tiajn rilataadjektivajn **kiu** ankaŭ en pseŭdosubpropozicioj (vd. § 238): *mi alvenis Anglion, kiu lando estis tiam en plena revolucio* (= en Anglion, en landon, kiu...); *vi ŝuldas al mi tri mil frankojn, kiun sumon vi pagu je la unua postulo* (= tri mil frankojn, kaj tiun sumon...).

Rim. Ĉe la dependaj demandoj: *mi ne scias, kian taskon mi donu al vi*; *mi ne povas decidi, kiun libron mi aĉetu* – temas ne pri rilataj, sed pri demandaj pronomadjektivoj.

Demandaj adjektivoj

82

Demandaj adjektivoj estas: **kiu**, **kia**, **kiamaniera**.

Kiu demandas pri iu elektita el difinita nombro (demanda adjektivo elekta): *kiu lernanto tion faris* (kiu el la lernantoj)? *kiun tagon ni havas hodiaŭ* (el la semajn-tagoj)?

Kia demandas:

1. Pri kvalito: *kia vetero estas hodiaŭ?* *kian uniformon li portas?* (respondo: *husaran*; sed: *kiun uniformon, la novan aŭ la malnovan* = kiun

el la du?).

2. Pri objekto ne rilatigita, en la spirito de la parolantoj, al difinita kvanto, aŭ pri abstrakta substantivo: *kiaj nekalkuleblaj riĉaĵoj estas en la naturo!*² *kian komprenon vi havas pri la libereco?*² *kia rezultato?*² *kian aĝon vi havas? kia dato estas hodiaŭ? kian libron vi legas?* (respondo: *la Faraonon*; sed: *kiun libron de Dickens vi legas?* = kiun el la libroj de D.).

Kiel oni vidas el la unua ekzemplo, la demandaj adjektivoj servas ankaŭ kiel ekkriaĵ, por esprimi admiron, surprizon, miron ktp.

Rim. I. Z. uzas jen *kian*, jen *kiun aĝon*. La ĝusta, laŭ la analogio de la supraj ekzemploj, ŝajnas *kian aĝon*, ĉar oni ne povas diri: *kiun el la aĝoj*, do ne temas pri determino elekta (vd. § 75). Sed precipe oni ne diru: *kioman aĝon*, ĉar oni ja ne povas respondi per vicmontra numeralo (vd. § 84; Rim. II).

Rim. II. Pri *kia* kaj kiel, *kia* kaj kiela validas la samo kiel pri *tia*, *tiel*, *tiela* (vd. § 80. Rim. I. kaj II).

Kolektivaj adjektivoj

83 Kolektivaj adjektivoj estas: *tuta*, *cetera*, *ĉiu* kaj *ĉia*.

La du unuaj estas veraj adjektivoj, kaj tial akceptas la uzon de artikolo antaŭ si. La du lastaj estas pronomoj uzataj kiel determinantoj, kaj tial ne toleras antaŭ si la artikolon.

La uzado de *tuta* kaj *cetera* ne prezentas malfacilon.

Pli delikata estas la ĝusta uzado de *ĉiu* kaj *ĉia*.

Por la determino *elekta* oni uzas *ĉiu*, *ĉiuj*: ili esprimas, ke temas pri senescepta nombro apartenanta al difinita grupo (*ĉiu lernanto*: ĉiu el la lernantoj), aŭ pri la tuta kategorio, kiun la substantivo reprezentas (*ĉiu homo* = la tuta homaro). Pri la diferenco inter la singulara kaj la plurala formoj vd. § 60.

Por la determino *kvalita* oni uzas *ĉia*: *ni ekskursos en ĉia vetero*; *ĉia dono estas bono*².

Por la determino *maldifina* oni uzas *ĉia*:

a) ĉe konkretaj substantivoj (malofte) por speciale signi, ke ili reprezentas nek ion apartenantan al difinita grupo, nek ion, kio estas reprezentanto de sia kategorio: *nun ĉia bubo povas ankoraŭ mokadi*².

b) ĉe abstraktaj substantivoj: *tio perdas ĉian signifon*²; *ĉia konkurado estos por ĉiam esceptita*²; *tio forigas ĉian dubon*²; *ĉia eĉ plej elementa inteligenteco*²; *forlasi ĉian superfluan balaston*²; kompreneble, kiam temas pri difinita nombro, oni devas uzi *ĉiu*: *ĉiuj miaj duboj*; *li kontentigis ĉiujn postulojn metitajn al li* (sed: *mi ne povas kontentigi ĉiajn postulojn*).

Dum *ĉiu(j)* difinas la kolektivon kiel dividitan en membrojn kaj montras senesceptecon, *tuta* difinas ĝin kiel unuon kaj montras senmankecon: *ĉiuj homoj* egalas al *la tuta homaro*. Oni do ne uzu *ĉiu*, kiam la determinato estas nedividebla: anstataŭ *per ĉiuj fortoj* pli ĝuste estas diri: *per la tuta forto*.

Rim. Anstataŭ *ĉiuj tiuj ĉi homoj* oni povas diri: *ĉiuj ĉi homoj*. Anstataŭ *ĉiuj tiuj homoj, kiuj...* oni diru: *ĉiuj homoj, kiuj...*

Kvantaj adjektivoj

84

Parencaj al la kolektivaj estas la kvantaj adjektivoj, per kiuj oni esprimas neprecizan kvanton aŭ nombron. Tiaj estas: **kelka**, **multa**, **malmulta**, **pluraj**. Singulare ili signas kvanton el nedifinita pli granda kvanto: *multa vino*, *kelka tempo*, *malmulta peno*. Plurale ili signas nombron: *multaj homoj*, *kelkaj gazetoj*, *malmultaj infanoj*. Ĉi lastajn oni povus nomi ankaŭ nedifinaj numeraloj.

Rim. I. Pri *pli ol unu* (pluraj) vd. § 33 B. 1 kaj § 178 A.

Kiel kvantaj adjektivoj funkcias laŭ sia senco ankaŭ la formoj: **kiom da**, **tiom da**, **iom da**, **ĉiom da**, **neniom da**, kaj ankaŭ vicmontraj: **kioma kaj tioma**: *kioma horo estas? en la kioman klason?*²

Rim. II. Pro la vic-montra signifo de la a-finaĵaj formoj oni ne uzu **kioma** kaj **tioma** en la senco kvanta. Do, ekz. *kioman monon vi havas?* estas tute malkorekta. Pli pardoneble estas tiel uzi **ioma**, **ĉioma** kaj **nenioma**, ĉar ili apenaŭ povas esti uzataj en vic-montra senco.

Rim. III. En la frua lingvo oni uzis **kiom** kaj **tiom** ankaŭ sen **da**. La samon oni trovas ankaŭ en la poezia lingvo ĉe Grabowski kaj aliaj: *kiom homojn vi vidis? min mirigas tiom stultaĵoj de via flanko*. En la poezia lingvo ĝi ŝajnas allasebla kaj estis aprobata ankaŭ de Zamenhof.

Ankaŭ la supraj kvantaj adjektivoj povas havi duan formon, konsistantan el adverbaj finaĵoj kaj **da**: *multaj homoj* aŭ *multe da homoj*; *kelkaj* aŭ *kelke da*; *malmultaj* aŭ *malmulte da* (sed: *plure da* ne estas uzata apud *pluraj*). La diferenco estas, ke la adjektiva formo povas esti uzata en ĉiuj okazoj, dum la adverbaj esprimas krome la ideon pri kuneco, kunmetiteco: *sur la arbo sin trovis multe da birdoj*² (sed oni ne povus diri: *multe da birdoj flugas en aŭtuno en pli varmajn landojn*); *mi volis doni al ŝi kelke da violoj*² (aŭ: *kelkajn violojn*). Sed oni ne povus diri: *kelke da homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj*).

Laŭ la vidpunkto de la akordo, **Z.** faras nenian diferencon inter la du formoj kaj li uzas antaŭ la adverbo same la artikolon aŭ pluralan adjektivon: *dum la kelke da minutoj de tiu ĉi rigardado*²; *ili ellernis tiun lingvon en la daŭro de iaj kelke da semajnoj*². Vd. ankaŭ § 169 a).

La pli gramatika formo: **multo da**, **kelko da** (*mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵoj*²) ne estas kutime uzata; kelkfoje ĝi servas por akcenti: *nia forteco estas nur la rezultato de multjara pacienca laborado de multo da personoj*².

Nedifinaj kaj neaj adjektivoj

Ni pritraktas kune tiujn du specojn de determiniloj, pro ilia rimarkinda simetrio.

Pri la formoj:

85

A. La nedifineco ordinare estas esprimata negative, per simpla foresto de la artikolo: *venis viro por viziti vin*. Sed, se oni volas nuanci la nedifinecon, oni uzas diversajn adjektivojn: *certa, unu* (nedifinita, sed difinebla), *iu, ia, ia ajn*.

Rim. I. Ĉe la nedifineco oni povas propre distingi du okazojn.

1) *Unuflanka nedifineco*. La koncernan aferon la parolanto konas kaj povus nomi, sed la alparolatoĵoj ne. Zamenhof en tia okazo sisteme uzis **unu**: *unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton...; mi uzas la okazon, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegajn meritojn; tiun vojon devis trairi unu ĉasisto, nomata Bryde, kiu...; mi parolis en komisio de unu sinjoro, kiu faras al ŝi amajn okulojn*; ktp.

2) *Duflanka nedifineco*. La koncerna afero ankaŭ de la parolanto ne estas konata. Tiun nedifinecon signas simple la foresto de determinanto: *li parolis pri hundo admirinde dresita*.

Tiu punkto estas la plej frapanta ekzemplo de nekonformeco inter la Zamenhofa kaj la nuna uzado. La ĉefa kaŭzo de tiu bedaŭrinda stato estis la saĝa sindeteno de Z. mem. Dezirante kiel eble plej simpligi la prezentadon de sia lingvo, li parolis nenie pri la uzo de la duondifina **unu**. La esperantistoj de la okcidentaj landoj, en kies lingvoj la nedifina artikolo servas por la du specoj de nedifineco sendistinge, ne komprenis la ŝajnan kontraŭdiron inter la regulo 1a de la Fundamenta Gramatiko kaj la uzado de Z. Tial, jam en 1902, Beaufront, reeldonante la Ekzercaron, korektis la komencon de "La Feino" jene: "*Vidvino havis du filinojn*"; kaj post li, ĉiuj aŭtoroj de lernolibroj sekvis la saman vojon. Eĉ kiam, en 1923, P. Corret penis revenigi al la uzado de Z., li estis ne kapabla klarigi ties uzon de **unu**. Aliflanke, kvankam la pola Grabowski sekvadis la vojon de Z., lia samlingvano K. Bein, konata sub la nomo de Kabe kiel "la unua stilisto esperantista", neniam uzis la duondifinan **unu**. Kaj estas verŝajne lia ekzemplo, kuniĝinte kun la aŭtoritata instruado de Beaufront, kiu determinis la novan iradon de la lingvo pri tiu afero.

Kiel ni ĵus diris, okazis pluraj provoj reveni al la Z-a uzado, sed ili ne prosperis. Ili efektive renkontas ne nur jam solidiĝintan kutimon, sed ankaŭ la fakton, ke por okcidentlingvano la distingo inter la du specoj de nedifineco estas iom delikata, dum ĝi ŝajnas pli facila ĉe la lingvoj, kiuj – ĉu latina, ĉu rusa – ne posedas difinan artikolon. Al tiuj ĝenoj oni devus krome aldoni la nereglecon de **unu**: al ĝi mankas en tiu senco kaj akuzativo kaj pluralo (en tiu okazo Z. uzas ne **unu**, sed **certaj**).

Laŭ la nuna tendenco do oni uzas **unu** nur, kiam temas pri efektiva nombro: *li havis unu filon kaj du filinojn*. Maksimume, oni povus konservi la oftan esprimon: *Unu tagon...*, en kiu la nombro estas nur aludita, sed tamen ŝajne alportas iom pli da precizeco, ol se oni diras: *Jun tagon*.

Rim. II. Verŝajne pro manko de taŭga esprimo, Z. uzis por la supra nuanco ankaŭ *certa*: *ekzistas certaj personoj, kiuj asertas...*; *certa sinjoro Frank*. Sed ankaŭ *certa* ne povas esti ĝenerale uzata en tia senco: se antaŭ personnomoj ĝi ĉiam estas klara, male, antaŭ la nomoj de aĵoj aŭ ideoj ĝi povas esti konfuzon per sia primitiva senco "nedubbla", do ŝajnas evitinda; oni prefere uzu anstataŭe *ia*.

Kiam temas pri person-nomo uzata kiel karakteriza difinilo pri iu kun similaj kvalitoj, oni povas distingi per la artikolo: *la lamentoj de Ikaro* (liaj propraj); *la lamentoj de la Ikaro* (de iu simila al Ikaro). Sed kiam temas pri unu certa el inter similaj, oni devas uzi **unu**: *Al Unu Madono* (poem-titolo).

B. La neado estas esprimata per la adjektivoj **neniu** kaj **nenia**. En tia adjektiva funkcio **neniu** povas esti ankaŭ plurale uzata (kp. § 65).

Ĉe la **uzado** oni distingas la tri okazojn pritraktitajn sub § 75.

1. *Determino elekta.* Oni uzas **iu** kaj **neniu**: *iu mia amiko* (iu el miaj amikoj); *iu verko de Goethe* (iu el la verkoj); *li kunportis neniun leteron el la promesitaj*; *neniu plano sukcesis el la tri*.

2. *Determino kvalita.* Oni uzas **ia** kaj **nenia**: *donu al mi ian leterfolion*; *mi havas nenan krajonon*, *nek ruĝan*, *nek bluan*.

3. *Determino maldifina.* Kiel ni diris (§ 75), per ĝi oni signas ion neapartenantan al pli-malpli difinita grupo, do ĉi tie ĝi esprimas la kompletan nedifinecon (maldifina adjektivo), kontraste al la u-formo, kiu difinas la kategorion, al kiu la unuopaĵo apartenas (duondifina adjektivo): *sur ia alta turo*^z; *legi ian verkon pri la lingvo internacia*^z; *sen ia eĉ plej malgranda difekto*^z; *simple preni ian lingvon*^z; *por la tutmondeco de ia lingvo ne estas sufiĉe nomi ĝin tia*^z; *ia dekjara lernanto diris al sia instruisto*^z; *se ni esceptos ian kriantan erarpaŝon*^z; *konduki al ia difinita celo*^z; *sen ia diferenco de la voĉaj organoj*^z; *iaj amuzoj*^z; *ia kara reĝo*^z; *sen ia kaŭzo*^z; *mi havas ian rilaton*^z; – *ĝi allasas nenan dubon*^z; *nenia kongreso povas elekti*^z; *tio havas nenan signifon*^z; *nenia ofero estas tro granda*^z; *ekzistas nenia danĝero en tiu ĉi loko*^z; *akcepti neniajn honorojn*^z; *fari nenan paroladon*^z; *uzi nenan alkoholaĵon*^k.

Kiel oni vidas el la supraj ekzemploj, oni povas tiri el la lingvuzo de Z. la regulon, ke al la maldifina determino respondas la a-formo. Tamen, tiun uzon li faris nur instinkte, kondukata de sia lingva sento; li diris nur: "ofte oni povas sen eraro diri *ia*, *nenia*, anstataŭ *iu*, *neniu*", sed konscie li ne metis striktan distingon. Li donas la sekvantajn ekzemplojn: *Ĉu vi vidis la ĉambristion aŭ la kuiristion? Mi vidis neniun servistion*; sed: *ĉu vi vidis junan servistion aŭ maljunan? Mi vidis nenan servistion*.

Nu, en ĉi tiuj du ekzemploj oni vidas, ke la kaŭzo de la diferenco inter la du frazoj kaŝiĝas en la artikolo. En la unua okazo la artikolo evidente montras, ke oni povas elekti nur el du servistinoj; en la dua, la nombro de la servistinoj ne estas limita. Komparu: *ĉu vi bezonas ĉambristion aŭ kuiristion? Mi bezonas nenan servistion*. – *Ĉu vi vidis la junan servistion aŭ la maljunan? Mi vidis neniun servistion*.

El la supraj ekzemploj do sekvas, ke la uzo de a-formo aŭ u-formo dependas de tio, el kio oni elektas. Se oni elektas el limita nombro, oni uzu la u-formon, se el nelimita nombro, oni uzu la a-formon. Do per **iu** aŭ **neniu** oni signas nedifinitan ulon aŭ aĵon apartenantan tamen al certa, pli malpli konata, difinita kategorio, dum per **ia** kaj **nenia** oni signas ulon aŭ aĵon de tute nedifinita speco: alidirite: **ia** = **iu aĵn**; **nenia** = **neniu aĵn**, **nepre neniun**. Ekzemple: *li sendis al mi neniun libron* (neniun el la atenditaj); *li sendis al mi nenan libron* (absolute neniun).

Kiam Z. havis en la penso ideon pri nombro (ne-unu), li uzis kelkfoje la u-formon: *neniun vorton plu*; *oni povas fari neniun riproĉon*; *la leĝo kreis ankoraŭ neniun grandan homon*. Sed: *nenia esploranto neas tion*^z;

nenia ŝtono perdiĝas^z; nenia senantaŭjuĝa homo povas dubi^z; nenia viva organa kreitaĵo^z. Do, ĉar li konfuzas la du formojn tute sendistinge, el lia lingvuzo oni ne povas tiri regulon. Baze de la supraj konsideroj, oni povas diri, ke la u-formo estu uzata, kiam la substantivon determinas adjektivo aŭ suplemento, aparteniganta ĝin al pli malpli strikte difinita kategorio: *neniu organa kreitaĵo* (neniu el la organaj kreitaĵoj); *neniu mia amiko* (neniu el miaj amikoj); *neniu verko de Goethe* (neniu el la verkoj de G.). Sed kiam la substantivo staras sola aŭ la adjektivo ne havas tian sencon, plej ĝuste estas uzi eĉ ne **unu** (la uzo de *unu* ja estas ĝuste tiam rajtigita, kiam oni pensas pri nombro); *mi ne diris eĉ unu vorton^z.* Do, anstataŭ la supraj Z-aj formoj, jenaj ŝajnus pli konvenaj: *eĉ ne unu vorton plu; ne povas fari eĉ unu riproĉon; ne kreis eĉ unu grandan homon (neniun grandan homon signifus neniun el la ĝisnunaj grandaj homoj)*.*

Rim. III. Cetere, ofte oni povas pli elegante esprimi la supran sencon per tute ne: *tute ne povas fari riproĉon*; aŭ per neniam: *la leĝo ankoraŭ neniam kreis grandan homon*. Sed nepre ne per nek **unu**, ĉar nek estas uzebla nur kune kun alia neo. Vd. § 123.

Oni evitu la esprimon **ne unu**, ĉar ĝi estas dusenca: 1. *ne nur unu, pli ol unu*; 2. *eĉ ne unu*. Oni do uzu ĉiam ĉi tiujn plenajn formojn.

Rim. IV. La diferenco inter la determinoj elekta kaj maldifina ofte permesas delikatan distingon. Ekz-e: dirante: *mi legis iun artikolon pri tiu ĉi temo*, oni subkomprenigas, ke aperis pluraj artikoloj kaj el tiuj oni legis iun, dum *ia artikolo* povas esti la sola aperinta. Same: *mi ricevis iun libron de mia amiko* neprigas posedan rilaton (iun el la libroj de...), dum *mi ricevis ian libron de mia amiko* neprigas ablativon (mi ricevis de mia amiko libron).

Resume: Por ekscii, ĉu temas pri determino elekta (u-formo), aŭ maldifina (a-formo), oni transformu *iu -o* al *iu el certaj, difinitaj -oj*. Se tiu transformo ne eblas sen senco-ŝanĝo, oni uzu a-formon (maldifina determino). La samo validas ankaŭ pri la formoj kun *ki-, ĉi-* kaj *neni-*.

Cetere, oni ne trouzu la maldifinan determinon! En Esp-o la nedifinecon signas la *manko* de determinilo: *mi vidis homon*. Ofte, kiam oni sentas la bezonon de nedifinilo, oni estas influata nur de sia nacia lingvo, havanta nedifinan artikolon, kiu mankas en Esp-o. Plej ofte oni povas forstreki ĉiujn *ia* el teksto, sen perdo de klareco, sed male, kun gajno de eleganteco.

Rim. V. Por eĉ plie akcenti la nedifinecon oni povas uzi ajn: *donu al mi iun ajn krajonon* (egale kiun el...). Anstataŭ la kvalita *ia ajn* oni trovas kelkfoje ajna: *oni povas tien iri en ajna vesto*.

* * *

* Certe pli facile kaj oportune estus uzi en tia okazo la nevarian nul: *nul vorton plu!*

Pluraj el la supraj adjektivoj, kaj kiel ni vidis en § 66, ankaŭ el la pronomoj, ricevis de Zamenhof paralelajn formojn: ili efektive konsistigas la ĉi suban *Tabelon*, kiu estas kompletigita per samkonstruaj adverboj (§ 88):

Signifoj	Individueco	Kvalito	Neŭtraĵo	Posedo
Nominativo	<i>iu</i>	<i>ia</i>	<i>io</i>	<i>ies</i>
Montra	<i>Tiu</i>	<i>Tia</i>	<i>Tio</i>	<i>Ties</i>
Demanda-Rilata	<i>Kiu</i>	<i>Kia</i>	<i>Kio</i>	<i>Kies</i>
Kolektiva	<i>Ĉiu</i>	<i>Ĉia</i>	<i>Ĉio</i>	<i>Ĉies</i>
Negativa	<i>NENiu</i>	<i>NENia</i>	<i>NENio</i>	<i>NENies</i>

Tiujn vortojn oni nomas ordinare *tabelvortoj*. Pri speciala karaktero de ilia prononco kaj akcentado, vd. "Parnasa Gvidlibro" (pĝ. 11).

LA NUMERALOJ

86 Aparta maniero de difinado estas la determinado de la preciza nombro. Tion oni faras per la *numeraloj*. (Pri la nepreciza nombro vd. § 84). Pro ilia komplekseco kaj iliaj propraj karakteroj ni ne klasis la numeralojn inter la adjektivoj, sed rezervis al ili apartan ĉapitron.

La numeraloj estas principe nevariaj adjektivoj: *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). Sed, pro nacilingvaj kutimoj, kelkaj estas variaj substantivoj; *nulo* (0), *miliono* (= mil miloj), *miliardo* (= mil milionoj), *biliono* (pli bone: *duiliono*). Tamen, pro deziro al unuformeco, kelkaj, eĉ tre konservativaj, uzas nevarian formon *nul*.

Rim. I. Sekve de tiu duobla kategorieco, ili ligiĝas al la sekvanta substantivo en du manieroj:

- a) la nevariaj adjektivoj senpere, **unu** kun singulara, la ceteraj kun plurala formo de l' substantivo: *unu knabo, du knaboj, cent homoj, mil soldatoj*.
- b) la variaj numeraloj pere de la prepozicio **da**: (*unu*) *miliono da pundoj; du miliardoj da markoj*. Normale **nulo** apartenas al tiu kategorio, kaj oni devus diri: *nulo da horoj*; sed estas preferinde uzi la nevarian formon de tiu nombro kaj diri: *la ekflugo okazos je nul horo kaj dek kvin minutoj*.
- c) kiam oni havas kombinon de la du kategorioj, oni uzas nur la unuan konstruon: *unu miliono du cent mil pengoj*.

Tiuj elementaj nombroj kunmetiĝas laŭ tiu regulo, ke nombro metita antaŭ *dek, cent, mil, miliono, miliardo, biliono* multiplikas tiujn nombrojn; metita post ili, ĝi adiciĝas al ili: *tricent* = 3 x 100, sed *cent tri* = 100 + 3.

La vicon oni montras almetante al la ĉi-supraj numeraloj la adjektivan finaĵon *-a*: *unua, dua, tria*, ktp. Ĉe la kunmetitaj nombroj, nur la lasta alprenas tiun finaĵon: *hodiaŭ estas la dudek-sepa de Marto*.

La multiplikadon, frakĉiigon kaj kolektivecon oni esprimas per apartaj sufiksoj, kaj la disdividon per unu prepozicio (vd. ĉi-poste § 87).

La skribreguloj de tiuj numeraloj estas jenaj: 1. Oni skribas per unu vorto la nombrojn, kiuj multiplikas unu la alian, kaj aparte tiujn, kiuj adiciĝas unu al la alia: *kvar kaj dek ok faras dudek du²; tricent kvardek du (= 342)*. Tamen oni aparte skribas la multiplikantojn de miloj, milionoj, miliardoj kaj supre: *ĝis pasos du mil tricent vesperoj²; du*

milionoj okcent kvindek du mil sepcent okdek kvar (= 2 852 784).

2. La vicmontraj numeraloj, de *unu ĝis naŭ*, se antaŭirataj nur de unu nombrovorto, ligiĝas al ĉi tiu per streketo: *dek-unua^z*; *kvindek-unua^z*; *en la sescent-unua jaro^z* (sed ja: *la jaro mil sepcent tridek dua^z*).

3. En la frakciaj nombroj, male, ĉiuj elementoj estas ligitaj per streketo: *tricent-sesdek-kvinono (= 1/365)*.

Al la numeraloj iel apartenas ankaŭ la apartaj adjektivoj *ambaŭ* (vd. § 61), *lasta kaj fina*, kaj eĉ *sola, unika*.

Rim. II. Kiam oni havas por montri la vicon de aro da nombritaj aferoj inter pluraj samaj aroj, estas konsilinde meti la vicmontran numeralon antaŭ la baza: *la historio de la unuaj dek jaroj^z* (de *la dek unuaj jaroj* farus konfuzon, precipe en la parolo, kun la *dek-unuaj!*); *la unuaj tri el la sep artoj*. Same estas pri *lasta: la lastaj tri eldonoj*.

A. — Bazaj numeraloj

Ni citis la bazajn numeralojn en la komenco de la § 86.

Ili havas kompleksan naturon; fakte, ili povas funkcii jen kiel substantivoj: *du kaj tri faras kvin*; jen kiel reprezentantoj: *kiom da libroj vi alportas?* — *Tri*; jen kiel adjektivoj: *tri viroj min atendis*. El tio sekvas, ke ili, kiel la substantivoj kaj la reprezentantoj, povas esti enkondukitaj per prepozicioj. Tiam okazon ni trovas en la frazoj: *kiom el vi ĉeestis?* *Ĉirkaŭ dek*; aŭ: *mi ne plu memoras la ĝustan nombron de la atestantoj: povis esti kvin ĝis sep*.

Tio klarigas la sekvantajn, unuavide strangajn ekzemplojn: *la koncerto daŭris ĉirkaŭ tri horojn^B*; *li donis al ili po kvin dolarojn^z*; *li povis kuŝi ok ĝis naŭ jarojn^z*; *ili povus loki en si nur ĝis kvar homojn^z*; *ili sendis kontraŭ ni inter cent kaj ducent soldatojn*. En ĉi tiuj frazoj ŝajne prepozicio kombiniĝas kun akuzativo por esprimi objekton aŭ adjekton sen ia ideo pri almovo — kio estus nekorekta (vd. § 175, Rim. II.). Sed efektive, en tiaj okazoj la prepozicio regas ne la substantivon, sed nur la numeralon, kiu do akiras valoron de substantivo aŭ de reprezentanto, kiel en la ekzemploj de la antaŭa alineo. Oni povas pruvi tion trimaniere:

1) Tiuj prepozicioj (*ĉirkaŭ, ĝis, inter, po, super*) povas stari eĉ antaŭ numeralo de subjekto: *ĉirkaŭ tri horoj pasis de tiam*; *ĉeestis ĝis kvar* (aŭ: *super cent*) *homoj*; *po tri kukoj kuŝis en iliaj teleroj*; estas evidente, ke prepozitiva substantivo ne povus funkcii kiel subjekto.

2) Se oni faras inversion, oni devas meti la prepozicion antaŭ la numeralon, ne antaŭ la substantivon: *ili manĝis pladojn ĉirkaŭ ses* (kp. *ili sidis ĉirkaŭ pladoj ses*).

3) Se oni demandas aparte pri la substantivo kaj pri la numeralo, la prepozicio kuniras ĉe la respondo ĉiam kun la numeralo: *ĉeestis ĝis cent homoj*; kiuj ĉeestis? *Homoj* (ne *ĝis homoj*); *kiom ĉeestis?* *Ĝis cent* (ne: *cent*).

Do: *la koncerto daŭris ĉirkaŭ tri horojn* signifas: *ĝi daŭris horojn, ĉirkaŭ tri*; *doni po kvin dolarojn* signifas: *doni dolarojn po kvin* (kvin al

ĉiu).

Rim. I. Verdire, la supraj prepozicioj tiaokaze havas la funkcion de adverbo. Ke ili tamen ne postulas e-finaĵon antaŭ numeralo, tion ni povas klarigi, baze de la supraj konsideroj, ankaŭ jene:

La numeralo, rilate al la antaŭa prepozicio, havas la funkcion de substantivo (alie la prepozicio ne povus rilati al ĝi). Male, rilate al la posta substantivo ĝi havas la funkcion de adjektivo (alie ĝi ne povus rilati al substantivo). Sed, aliflanke, al adjektivo povas rilati nur adverbo, do rilate al la adjektiva funkcio de la numeralo, la prepozicio ŝajnas adverbo. Tial oni povas diri, ke tiuj prepozicioj estas uzataj *pseŭdoadverbe*.

Kompreneble, tio povas okazi nur ĉe numeraloj, ĉar nur tiuj povas havi tian kompleksan funkcion. Do prepozicioj nur antaŭ numeralo povas esti pseŭdoadverboj, cetere ili devas alpreni la e-finaĵon: *la suno montris ĉirkaŭe tagmezon*.

Laŭ la supraj klarigoj, oni do devas uzi en la supraj okazoj ĉiam tiun kazon de la substantivo, kiu postulas la sintaksa funkcion (vd. la suprajn ekzemplojn). Kp. § 207.

Rim. II. La lingvuzo de Z. tiarilate ne estas unueca. Li uzis akuzativon post *ĝis kvar* (vd. supre), sed li uzis kelkfoje nominativan objekton post *ĉirkaŭ*; kaj post **po** li uzis akuzativon nur unufoje, kvankam li diras same bona ankaŭ la akuzativon post **po**. Pri **po** vd. sube ĉe la distribuo.

B. — Ordaj (vicmontraj) numeraloj

La ordaj aŭ vicmontraj numeraloj estas uzataj por montri la vicon de io ajn en serio; do, por difini: la paĝojn aŭ ĉapitrojn de libro, la vicon de persono en klaso, dinastio ktp., la datojn (horon, tagon, jaron): *la vorto troviĝas sur la 33a paĝo, en la 3a ĉapitro; Frederiko la 2a; G. Vaŝington estis naskita la dudek-duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua^z; li alvenis je la oka horo vespere; ĉiun sesan sekundon*.

Por fari la adverbajn formojn de la ordaj numeraloj oni anstataŭigas la a-finaĵon per la e-finaĵo: *unue, due, trie*, ktp.

Rim. I. Ordinare oni ne esprimas la vortojn *horo, tago, jaro* en la datoj, kiam tio ne estigas konfuzon, sed oni ĉiam esprimas la vorton *monato* aŭ la monatinomon: *hodiaŭ estas la dudek-sepa de Marto^z; la leteron, kiun vi sendis la dekan de la kuranta, de la pasinta monato*.

Rim. II. En la presajoj, oni, pro praktikaj konsideroj, anstataŭigas la *-an* per simpla punkto post la tagocifero, kaj oni ne uzas vicmontran formon por la jaro: *la 6. Oktobro 1906*; tiu dirmaniero venis eĉ en la parolan lingvon, kaj nun multaj legas la supran ekzemplon: *la sesan de Oktobro mil naŭcent ses* (kaj ne: *sesa*). Tio okazas eĉ ĉe la adresoj: *strato Poŝtoficeja, domo numero naŭdek sep, en la korto tria etaĝo^z*; same ĉe alispecaj numeroj: *la verkon N^o 60 mi sendos al vi post 6-8 tagoj^z*.

Rim. III. Ĉe kelkaj adjektivoj montrantaj neprecizan nombron (*multa, kelka, plura*) oni ne povas fari vicmontran formon per la a-finaĵo, ĉar ĝi ne diferencus de la adjektiva formo. Tiaj formoj, cetere, apenaŭ estas necesaj. En okazo de neceso, tamen, oni povus helpi sin tiel, ke oni pluformas la vicmontran adjektivon el la adverbaj formoj, kiu havas kvazaŭ substantivan funkcion: *multea, kelk-*ea*, plurea*. Iom analoga estas *postea* (Grabowski) por signi tempon (ne lokon).

C. — Multipliko

La multiplikon esprimas la sufikso **obl**. Ĝi almetiĝas precipe al numeraloj por formi:

1. *adjektivojn*, kun du signifoj: aŭ, ke la koncerna objekto estas tiomfoje pli granda, multa, kiom montras la radiko: *ricevi dekoblan profiton* (dek fojojn pli grandan ol alia, ol antaŭa ktp.); *duobla sumo da mono*^z; aŭ, ke la koncerna objekto konsistas el tiom da partoj, kiom montras la radiko: *ili faris la surbrustafon duobla*^z (= el du surmetitaj partoj); *duobla kaverno*; *en la spaco naĝis miloblaj fluoj da homaj pensoj*^z; *triobla kiraso*.

2. *adverbojn*, kun la signifo "en kvanto aŭ mezuro tiomfoje pli granda, kiom montras la radiko": *ili kolektis duoble da pano*^z; *li ricevis duoble pli ol tio, kion li havis antaŭe*. Tiuj adverboj povas determini bazan numeralon esprimante multiplikadon: *duoble sep estas dek kvar*.

3. *substantivojn* por signi kvanton tiomfoje pli grandan, kiom montras la radiko: *dudek estas la kvaroblo de kvin*. Per pluformado, oni ricevas

4. *verbojn* helpe de la sufiksoido *-ig*, por signi "multipliki tiom aŭ tiom da fojoj": *obligante 3 per 5 oni ricevas 15*; *duobligu ĉiujn gardostarantojn!*

Rim. I. La sufikso **obl** almetiĝas ankaŭ al la adjektivoj esprimantaj neprecizan kvanton (vd. § 84): *mia laboro valoras kelkoble pli, ol kiom vi donas al mi por ĝi*^z; *la posedo de la Biblio estus pli grava... ol la posedo de multoble pli granda kvanto da aliaj verkoj*^z; *multobligi vegetaĵon per branĉplantado*.

Rim. II. Oni ne konfuzu *-obl* kun *-foj*: la unua signas multiplikon, la dua ripetadon: *duobla pago* (havanta la valoron de du simplaj pagoj aŭ farita samtempe de du flankoj) kaj: *dufoja pago* (farita du fojojn de la sama persono); *kiomoble kvar estas dek du? kiomfoje vi pekis?*

D. — Fraksiigo

La fraksiigon esprimas la sufikso **on**. Ĝi almetiĝas nur al numeraloj, por formi precipe substantivojn, kiuj esprimas parton de fraksiita nombro: *duono de ni mortos*^z; *el multaj milonoj fariĝas milionoj*^z. Sed oni povas formi ankaŭ adjektivojn: *triona horo* (=triono de horo), kaj adverbojn: *iele, iome, duone malbone*^z; *li faris sian taskon nur trione*; ĉi tiuj adverboj povas determini bazan numeralon por esprimi dividon: *trione dek du estas kvar*.

La suplementojn de frakcia substantivo enkondukas *de kaj ne da* (vd. § 133. H. 2).

Kiam frakcio aldoniĝas al entjera nombro, ili devas esti malsame konstruitaj, ĉar la entjera nombro estas epiteto de la sekvanta substantivo (*du horoj*), dum rilate al la frakcio la substantivo estas suplemento (*duono de horo*); oni do ne povas diri: *du kaj duonon de horoj poste*. En tiaj okazoj, la Fundamenta Ekzercaro proponas elekton inter: *du metroj kostas kvar kaj duonon frankojn* aŭ *da frankoj*. La unua

formo troviĝas plurloke en la Fundamenta Krestomatio, la duan Z. uzis pli ofte: *homero kaj duono da hordeo*. Pro la ĝena elipso de prepozicio en la unua (... *duonon frankojn*), kaj pro la plistriktiĝo de la uzado de **da** en la dua (vd. § 133), oni nun emas eviti ambaŭ, kaj aŭ oni esprimas la substantivon tuj post la entjera nombro subkomprenante ĝin post la frakcia: *du horojn kaj duonon poste* (sed tia dirmaniero ne estas tute internacia, kaj ĝenas ekz-e la orientanojn); aŭ oni prefere uzas frakcian adjektivon: *du kaj duonan horojn poste*; *unu kaj duona funto da pano*; *dek kaj tri kvaronaj dekduoj da gantoj*.

Rim. Pri la signifo de *duon* kiel prefikso, vd. § 415.

E. — Kolektivigo

La kolektivigon esprimas la sufikso **op**. Ĝi almetiĝas principe al numeraloj, por formi adverbojn kaj adjektivojn, kiuj signas, el kiom da elementoj konsistas certa grupo: *akiro kaj perdo rajdas duope^z*; *ŝi restis duope kun la virino^z*; *kvinope ili fetis sin sur min^z*; *triopa alianco*; *kvaropige faldita papero^z*; *fadeno triopigita ne baldaŭ disŝiriĝos^z*.

Rim. I. **Op** almetiĝas ankaŭ al adjektivoj signantaj neprecizan kvanton: *multope ni pli frue finos la laboron ol unuope^z*.

Rim. II. **Op** propre servas por signi la veran sencon de la a-finajo kaj e-finajo ĉe la numeraloj, kie tiuj ricevis vicmontran signifon: *marŝi triope* egalvaloras: *marŝi trio-e*. Ĉe la substantiva formo tio ne estas necesa, tial *duopo* estas samsignifa kun *duo*.

Rim. III. Kelkfoje oni renkontas **op** en la senco: *en egalaj partoj konsistaj el...* Ekzemple: *versĵi gutope*; *marŝi grup-ope*; *la naŭ gastoj sidis triope* (en tri triopoj). Tio estas erara, ĉar tie ĉi temas ne pri kolektivigo, sed pri distribuo, do oni devas uzi aŭ **po**, aŭ la esprimon "laŭ ...opoj": *la gastoj sidis laŭ triopoj*.

F. — Distribuo

La distribuon esprimas la prepozicio **po**.

Po antaŭ kvantesprimo signas, ke tiu kvanto estas unu el la egalaj partoj de sia pluroblo. *Po tri* do esprimas, ke la multoblo de tri (9 aŭ 15 aŭ 120 ktp.) dividiĝas en egalajn partojn konsistantajn el tri unuoj. *La gastoj venis po tri* signifas, ke ili venis en egalaj grupoj kaj ĉiuj el tiuj grupoj konsistis el tri personoj.

Krom tio, **po** signas ankaŭ tion, ke la kvanto, kiun ĝi enkondukas, rilatas aŭ koncernas ian grupon da personoj aŭ objektoj ne unuoble, sed tiomoble, el kiom da personoj aŭ objektoj konsistas tiu grupo: ĉiun unuon de la grupo rilatas aŭ koncernas la tuta esprimita kvanto: *la gastoj trinkis vinon po du glasoj* signifas, ke ĉiu gasto trinkis du glasojn da vino.

Pq, estante prepozicio, formas distribuajn adjektojn (vd. § 207 B.) kaj distribuajn suplementojn (vd. § 133 I.). Ĝi do formas regulajn po-prepozitivojn.

Sed krom tiuj regulaj okazoj, **po** estas uzata ankaŭ en tiaj kompleksoj,

kiuj funkcias en la frazo aŭ kiel subjekto, aŭ kiel objekto: *po du boteloj staris sur la tabloj; ili ricevis po kvin pomoj*². Tiam **po**-komplekson, por distingi ĝin de la regula **po**-prepozitivo, ni nomu **po**-esprimo.

La **po**-esprimo propre ŝajnas kontraŭgramatika. La sola okazo, nome, kiam prepozitivo povas funkcii kiel subjekto aŭ objekto, estas la citaĵo, formanta gramatike nedisigeblan unuon: "*Sur la monto*" estas bela poemo. Sed la **po**-esprimo evidente ne estas citaĵo; do ĝi, kiel prepozitivo, povas esti uzata nek subjekte, nek rektobjekte. *Ili ricevis po kvin pomoj* estas same kontraŭgramatika, kiel se oni dirus: *mi malamas sen sincero* anstataŭ *sensincerecon*, aŭ *mi vidis ĉirkaŭ la domo* anstataŭ *mi vidis la domĉirkaŭon*.

Jen kial multaj (Kabe, Lippmann, Bennemann, Setälä ktp.) opiniis, ke **po** tiaokaze estas adverbo, kaj ili uzis en la rektobjekta **po**-esprimo akuzativon, laŭ la sola zamenhofa ekzemplo: *al ĉiu li donis po kvin dolarojn*². Aliaj persistis ĉe la nominativo, laŭ la konstanta zamenhofa uzado. Ŝajnas do necese esplori detale tiun **po**-esprimon: *ili ricevis po kvin pomoj*.

Ĝia specialaĵo estas, ke ĝi esprimas per unu komplekso samtempe du aferojn: la distribuataĵon (*pomoj*) kaj la distribu-manieron (*po-kvin*). Ĉe la analizo do ili disfalas en du partojn, kaj **po** apartenas ekskluzive al la distribu-maniera parto, do al la numeralo. Efektive, oni ne povas diri: *ili ricevis po pomoj*; sen la numeralo **po** fariĝas sensenca. Do *po kvin pomoj* post la forpreno de *kvin* aŭtomate reduktiĝas je *pomojn*, kio evidente pravas, ke **po** ne havas gramatikan rilaton al la substantivo *pomoj*.

Rim. I. Ĉe la **po**-adjekto la afero estas alia, ĉar la distribuataĵo estas esprimita per aparta frazelemento. En: *prenu la medikamenton po 20 gutoj* – la distribuataĵo estas la medikamento, kaj la **po**-prepozitivo signas sole la distribu-manieron, nome, ke la medikamenton oni devas preni po gutoj (ne po kuleroj ekz-e), kaj ke la gutoj devas esti po 20, t.e. 20 ĉe ĉiu preno. **Po** do rilatas same al la substantivo (*po gutoj*), kiel al la numeralo (*po 20*).

Ĉe la **po**-esprimo do okazas tio sama, kio ĉe aliaj prepozicioj (*ĉirkaŭ, ĝis, inter, super*) starantaj antaŭ numeralo (vd. ĉi-supre, § 87 A.). La numeralo estas duvizaĝa: kiel kvazaŭ-substantivo ĝi formas adjekton kun la prepozicio, kaj samtempe, kiel kvazaŭ-adjektivo, ĝi funkcias epitete antaŭ la substantivo. Tion pravas inter aliaj (vd. § 87 A.), ke postmetite la **po**-numeralo iĝas adjekto: *ili ricevis pomojn po kvin*. Nome, la epitetan funkcion certigis sola la antaŭsubstantiva pozicio de la numeralo; se ĝi ĉesas, validiĝas sole la adjekta funkcio. Sed evidente ĝi povas validiĝi nur tial, ĉar ĝi ekzistis jam antaŭ la inversio.

Oni do ne bezonas rigardi **po** adverba en la **po**-esprimo, kio estus same kontraŭgramatika, ĉar prepozicio povas en Esperanto adverbiĝi nur per la e-finaĵo (*ekstere, krome* ktp.). Ĉar **po** ne rilatas al la substantivo, ĉi tiun ĝi ne povas influi gramatike, do post **po** la rektobjektan substantivon oni devas meti en akuzativon: *ili ricevis po kvin pomojn*.

Rim. II. En la po-afero (nominativo aŭ akuzativo?) interluktas la gramatika logiko kaj la tradicio. Tamen, ankaŭ la tradicio ne estas tiel firma. Multaj bonaj aŭtoroj ja uzas akuzativon, kaj ankaŭ mem Z. deklaris: "estas malfacile ankoraŭ diri, kiu (akuzativo aŭ nominativo) estas la pli bona, kaj tial ambaŭ estas uzeblaj kaj bonaj". Tion li skribis en 1891, kaj lia "ankoraŭ" montras, ke li fidis la uzadon por solvi la problemon. Sed la uzado ankoraŭ nun ne definitive fiksigiĝis, kaj tial ni sentas nin liberaj pledi por la konkludo de la ĉi-supra logika esploro, t.e. favori en tiu okazo la uzon de la akuzativo.

Rim. III. Ĝuste pro la konscio de tiu konflikto inter gramatiko kaj tradicio, pluraj solvis por si la aferon tiel, ke ili simple evitas la po-esprimon. Tiu evito nome estas ĉiam ebla:

1. Oni povas uzi *ĉiu*, kaj *po* fariĝas superflua: *ĉiu el ili ricevis kvin pomojn*.
2. Oni povas tiel turni la frazon, ke la po-komplekso fariĝu adjekto: *ili trinkis vinon po du glasoj* (anst. *trinkis po du glasojn da vino*); *mi donis al ili pomojn po kvin (pecoj)*; *sur la tablojn oni metis florojn po unu bukedo* (anst. *metis po unu bukedo*).
3. Oni povas uzi *po* kiel prefikson, kaj tio estus la plej simpla solvo: *ili ricevis po-du pomojn*. Tiam estas okulvideble, ke *po* apartenas sole al la numeralo.

Po-komplekso povas esti antaŭata de kroma prepozicio: *oni sidigis la dikegajn geedzojn sur po du seĝojn* (direkta akuzativo!); *la studentoj estis ekzamenataj pri po du tezoj*. Ankaŭ tiaokaze *po* rilatas sole al la numeralo.

Rim. IV. Se *po* staras antaŭ la numeralo, ĉi tiun ĝi sence multobligas: *po unu = pluroble unu*. Tial, laŭ rigora logiko oni devus meti la substantivon tiaokaze en pluralon: *po unu bukedoj*. La forta singulariga efiko de *unu* tamen eldeigas la ununombro: *po unu bukedo*. Tio estas tute analoga al: *pli ol unu homo*. Tamen ekzistas okazoj, kiam pluralo estas necesa: *la afrikatoj estas miksitaj el du bruoj, tamen ili estas po unu konsonantoj*. Tie ĉi *ili* pli forte efikas ol *unu*. Sed oni dirus: *ĉiu el ili estas po unu konsonanto*.

Precipe slavlingvanoj (ankaŭ Z.) ofte uzas anstataŭ *po unu* simplan *po*: *ili trinkis po glaseto*. Gramatike tio estas nepravigebla, ĉar *po* rilatas sole al *unu*, do ĉi tiu ne estas ellasebla. Oni povas sin helpi per *poa*: *poan glaseton*; *ili ricevis poan kordon da pomoj*. Same *poa* estas uzebla, kiam la kvantesprima numeralo ne estas "duvizaĝa" (ekz-e *miliono*, *duono*, ktp.): *ili trinkis poan duonon de litro da vino*; *la du bankieroj gajnis poan milionon de dolaroj*. Sed oni povas diri ankaŭ: *vinon po duono da litro*; *dolarojn po milionon*. Ĉe kompleksaj kvantesprimoj aŭ ĉe kvantaj adjektivoj, oni povas uzi *poe*: *la knaboj ricevis poe du pomojn kaj duonan*; *tiuj studentinoj havis poe plurajn amantojn*. Sed en ambaŭ okazoj la uzo de *ĉiu* estas multe pli simpla kaj klara.

Ĉe la po-esprimoj povas temi pri du specoj de distribuo.

1. **Rilata distribuo.** Oni signas, ke ia kvanto koncernas ĉiun aparte el nombro da personoj aŭ objektoj: *po du soldatoj pafis el la tri fenestroj* (du el ĉiu fenestro); *po tri gastoj sidis apud la tabloj* (tri ĉe ĉiu tablo); *la du laboristoj ricevis po cent frankojn* (ĉiu cent frankojn).
2. **Reciproka distribuo.** Du interrilatantaj kvantoj estas dividitaj en egalajn partojn, kaj tiuj partoj reciproke koncernas unu la alian. Pri tia

distribuo mankas zamenhafa ekzemplo. Plej bone estas meti **po** dufoje: *mi ricevis po mil frankojn de po du membroj* (mil frankojn de ĉiu membro-duopo); *mi donis po tri pomojn al po du infanoj* (tri pomojn al ĉiu infan-duopo).

Rim. V. Oni povus ellasi **po** ĉe la rekta objekto: *mi ricevis kvin frankojn de po du membroj*. Sed kun la duobla **po** la kompreno estas pli facila.

Rim. VI. Oni atentu pri tio, ke **po** enkondukas ĉiam unu el la distribuitaj partoj de kvanto, kaj ne tiujn unuojn, al kiuj tiu kvanto rilatas. Eraraj estus ekz-e: *li marŝis 40 kilometrojn po tago* (ĝuste: *po 40 kilometrojn tage*); *enmiksi unu kuleron po litro* (ĝuste: *po unu kulero en litron*). La esceptecon ĉe la reciproka distribuo pravigas, ke tie ankaŭ la rilataj unuoj estas distribuitaj.

Inter la gardantoj de la Z-a kutimo estas D-ro Pumpr, kies vidpunkto estas ĉi tie menciinda: li rigardas la po-komplekson, same kiel la aliajn analogajn (*ĉirkaŭ tri horoj, ĝis cent homoj* ktp.), kiel unu tutajon, kiu ludus, sen ia interna ŝanĝo de formo, la diversajn rolojn de subjekto, objekto aŭ adjekto, kaj kies elementoj oni ne pli bezonus analizi, ol tiujn de kunmetita vorto: *po tri glasoj da vino staris sur la tabloj*; *la gastoj trinkis po tri glasoj da vino*; *oni prezentis unu teleron da kukoj kun po tri glasoj da vino*.

G. – Aritmetikaj formuloj

La aritmetikajn formulojn oni legu jene:

decimala frakcio: $0,2$ nul komo du; $3,08$ tri komo nul ok.

adicio: $3 + 4 = 7$ tri plus kvar faras sep (aŭ: tri kaj kvar estas sep).

subtraho: $10 - 6 = 4$ dek minus ses faras kvar (aŭ malpli klare: ses el dek estas kvar).

multipliko: $2 \times 6 = 12$ duoble ses faras dek du (aŭ: du per ses estas dek du).

Rim. I. Analoge: formato 14×20 cm. *formato de dek kvar per dudek centimetroj*.

divido: $61 \div 4 = 15/1$ sesdek unu dividite per kvar faras dek kvin, restas unu; $4 \div 2 = 2$ duone kvar estas du.

Rim. II. La rezultoj de tiuj operacioj estas nomataj respektive: *sumo, diferenco, produto, kvociento*.

frakcio: $3/7$ tri sur (aŭ: super) sep, tri seponoj.

Rim. III. Oni zorge apartigu la grupojn de ciferoj; ne konfuzu ekz-e: *tridek-kvin milonoj* (35/1000) kun: *tridek kvin-milonoj* (30/5000) kaj kun: *tridek kaj kvin milonoj* (30 5/1000).

potencigo: 15^3 dek kvin en la tria potenco; $2^4 = 16$ la kvara potenco de du estas dek ses: *levi nombron al la kvina potenco*;

elradikado: $\sqrt[4]{625} = 5$ la kvarapotenca radiko de sescent dudek kvin estas kvin.

proporcio: $2 : 4 = 1 : 2$ du rilatas al kvar, kiel unu al du; *en proporcio du al tri*.

La algebrajn formulojn oni legu jene:

a' a strekita (aŭ: a streka);

a'' a duoble strekita (aŭ: a dustreka);

a^0 , a^1 , a^x a nulgrada, a unugrada, a iksgrada (aŭ: a nulpotenca, ktp.);

\bar{a} a sub trabo;

$-\infty$ minus infinito;

$\sqrt[n]{\quad}$ radiko noagrada;

Σ^k sigma ĝis ko;

$n!$ faktorialo no;

$f(x)$ funkcio de ikso;

\int_a^b integralo de a ĝis bo.

I. — Kelkaj esprimoj

Ni pritraktos tie ĉi kelkajn esprimojn rilatajn al numeraloj:

a) la aĝo. Oni demandas per: *kian aĝon vi havas?* (sed ne: *kioman aĝon!*); *kia estas via aĝo? kiomjara vi estas? kiom vi aĝas?* Oni respondas per: *mi havas 34 jarojn; mi estas 34-jara; mi estas en mia 34-a jaro; li havas la aĝon de ĉirkaŭ 25 jaroj.*²

b) la h o r o. Oni demandas: *kioma horo estas?*

Oni respondas en du manieroj:

1. helpe de kaj: *estas la 3a kaj dek minutoj (3h 10); la 3a kaj duono (3h 30); la 3a kaj tri kvaronoj (3h 45); la 3a kaj kvindek kvin (3h 55).*

2. helpe de antaŭ kaj post. Oni difinas la minutojn de 1 ĝis 30 per post, kaj de 31 ĝis 59 per antaŭ: *estas dek post la tria (3h 10), la duono post la tria (3h 30), kvarono antaŭ la kvara (3h 45), kvin minutoj antaŭ la kvara (3h 55).*

La unua maniero havas la avantaĝon sekvi la ordon de la ciferoj en la horaro; la dua estas pli oportuna por la lastaj dudek minutoj antaŭ la sekvanta horo.

Rim. Ne uzu la germanan dirmanieron (*dek minutoj de la kvara = 3h 10*) pro ĝia konfuziveco.

c) l a d a t o. Oni demandas jen per: *kioman tagon ni havas hodiaŭ?* aŭ: *kia dato estas hodiaŭ* – jen per: *kiun tagon ni havas hodiaŭ?*

Al la unua demando oni respondas per: *hodiaŭ estas la 10a de Januaro ktp...*; al la dua per: *hodiaŭ estas lundo ktp...*

LA ADVERBO

88

La adverbojn oni povas dividi en du klasojn: en *primitivajn* kaj *derivitajn*. La primitivaj adverboj estas tiaj laŭ sia naturo kaj uziĝas, sen ke oni bezonus aldoni al ili ian finaĵon. La derivitaj adverboj estas tiaj nur pro la almetita finaĵo -e kaj ne povas esti uzataj sen ĝi.

Primitivaj adverboj

Inter la primitivaj adverboj oni povas distingi tri grupojn, laŭ formaj simetrioj: *la tabel-adverbojn*, *la aŭ-adverbojn* kaj *la nesimetriajn aŭ unu-silabajn adverbojn*.

La tabel-adverboj

Zamenhof uzis la radikojn, sur kiuj baziĝas la ĉefaj pronomoj (vd. § 85), por konstrui per ili ankaŭ la ĉefajn adverbojn. Al tiuj radikoj *i-*, *ti-*, *ki-*, *ĉi-*, *neni-* li do aldonis diversajn elpensitajn silabojn, el kiuj nur unu (-e) retroviĝas kiel libera finaĵo en la lingvo, sed kun alia signifo: en la tabelo ĝi esprimas la lokon, dum en la libera funkcio ĝi signifas la manieron.

Rim. I. Tiu malsimetrio malhelpas, ekz-e, ke oni derivu tabelajn adverbojn el alia radiko ol el la 5 supraj, dum nenio ĝenas derivi el tiaj tabelajn pronomojn. La uzo de *alio* aŭ *aliu* anstataŭ *io* aŭ *iu alia*, kaj de *alies* anstataŭ *de iu alia* (vd. § 62) estas pravigeblaj "ennovigajoj", ĉar nemiskompreneblaj kaj oportunaj: *oni ĉiam trovas ĉarmaj la kapricojn de alies edzino*. Male, *aliel*, *alie* (= aliloke), *aliam* ktp., ne malofte renkonteblaj en la proleta literaturo, estas malaprobindaj, ĉar ŝanĝante (ĉe *alie*) la sencon de fundamenta elemento, ili jam tuŝas al reformo.

Signifoj	Loko	Tempo	Kaŭzo	Maniero	Kvanto
Nedifinaj	<i>ie</i>	<i>iam</i>	<i>ial</i>	<i>iel</i>	<i>iom</i>
Montraj	<i>Tie</i>	<i>Tiam</i>	<i>Tial</i>	<i>Tiel</i>	<i>Tiom</i>
Demandaj	<i>Kie</i>	<i>Kiam</i>	<i>Kial</i>	<i>Kiel</i>	<i>Kiom</i>
Kolektivaj	<i>Ĉie</i>	<i>Ĉiam</i>	<i>Ĉial</i>	<i>Ĉiel</i>	<i>Ĉiom</i>
Negativaj	<i>NENie</i>	<i>NENiam</i>	<i>NENial</i>	<i>NENiel</i>	<i>NENiom</i>

La tabel-adverboj ne havas komparacion.

Ili estas, laŭ la postuloj de la senco, pluformeblaj per finaĵo aŭ sufikso.

1. **Loko.** La lokaj tabel-adverboj povas alpreni la akuzativan finaĵon por montri la almovon: *kien vi iras?*

Al ili povas ankaŭ esti aldonata la adverbo *ĉi*, por montri pliproksimecon: *venu ĉi tien!* (vd. § 54, Rim. I.).

Rim. II. Zamenhof uzis *ĉi* ankaŭ kiel memstaran adverbon en la senco *ĉi tie*: *aspe- roloj jam ĉi estis, freŝaj kaj bonodoraj; tute ne ĉi estis vento*. Tio tamen ne estis imitata. Sed laŭ lia ekzemplo, oni povus ja uzi ĝin tiel en du okazoj:

a) senpere antaŭ verbo, precipe antaŭ *estas*: *ĉi estas multe da libroj; ĉi ludas infanoj*. La senco *ĉi*-okaze estus parenca al *jen*, sed sen ties atentaltira nuanco;

b) senpere antaŭ lok-adjekto: *legu ĉi en la ĉambro; belan vidaĵon oni povas ĝui ĉi sur la monto*. La senco *ĉi*-okaze estus: *kie nun ni estas*.

Tie kaj kie estas uzataj ankaŭ metafore por esprimi la okazon: *la vorto "ĝardenon" staras tie ĉi en akuzativo^Z; en tiaj okazoj, kie vi ne scias, ĉu...^Z; la reĝido petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio venas^Z*.

Pluformado: *tiea, ĉiea; al mi plaĉas la ĉi-tiea urbeto^Z; ĉu vi estas ĉi-tie-ulo?*

2. Tempo. Iam signifas regule "en nedefinita tempo", do, en la pasinteco aŭ en la estonteco: tion montras pli precize nur la tempo de la predikato: *iam estis reĝo...; venos iam la tago...* (vd. § 193 kaj 196).

Tiam kaj kiam estas ankaŭ uzataj por esprimi la cirkonstancojn, la kondiĉaron de la ago; *se ni konscios bone la esencon kaj celon de niaj kongresoj, tiam ni venados al ili kun ĉiam freŝa entuziasmo^Z; la artikolo estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj... konataj^Z*.

La esprimo por ĉiam estas prefere uzinda pri ago, kiu mem estas momenta, sed kies sekvoj estas longedaŭraj: *li forlasis por ĉiam tiun ĉi sendankan landon*.

Pluformado: *iama* (atentu! ĝi signifas nur: "iam estinta" kaj aplikigas nur al la pasinteco); *tiama, ĉiam kutimo, porĉiam donaco; la tago de Sankta Neniama^Z*.

Rim. III. Dum la unua jaro de Esperanto, la tempaj tabel-adverboj finiĝis per *-an*; por eviti konfuzon kun la akuzativo de la tabel-adjektivoj, Z. poste ŝanĝis *-an* al *-am*.

Rim. IV. La lokaj kaj tempaj adverboj estas uzataj kelkfoje ligite kun **kaj** (ĝ e m e l a j a d v e r b o j); per tio oni signas sporadecon. Oni trovas diversajn kombinojn: *tie kaj tie ĉi; tie kaj tie; tie kaj ie; ie kaj ie – iam kaj iam; tiam kaj tiam; tiam kaj iam*. Ni konsilas: *tie kaj tie aŭ tie kaj ĉi tie* por la loka; dum por la tempa ŝajnos pli oportuna la formo *foje-foje* (vd. § 196).

3. Kaŭzo. Ial signifas "el ia kaŭzo" (kiun oni nescias aŭ ne bezonas difini): *preskaŭ en ĉiuj lingvoj ĉiu substantivo ial apartenas al tia aŭ alia sekso^Z*.

Diference de la ceteraj ki-vortoj, **kial** estas nur demanda adverbo, kaj signifas "pro kia kaŭzo? el kia motivo?": *kial vi ne respondas? klarigi la motivojn, kial (= pro kiuj) ni ĝin ne efektivas^Z*.

Rim. V. Oni trovas sporade ĉe Z. ekzemplojn de **kial** kun subjunkcia rolo post verboj de riproĉo; la senco estas proksimume "kun la motivo, ke"; la komparo inter jenaj du frazoj klarigos la originon de tiu elipsa dirmaniero: *mi faris mallaŭdon al la eminentuloj... kaj diris al ili: Kial vi faras tian malbonon?* (Nef. XIII, 17); *mi ricevis mallaŭdon: kial liberpensaj ideoj estas inspirataj al la junul-*

aro (Revizoro, p. 9); tiel klariĝas ankaŭ: *ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto* (Ekzercaro § 17); *el timo, ke ni ne riproĉu ilin, kial ili ne subtenas nian aferon* (O.V., p. 122).

Ĉial kaj **nenial** ne troviĝas en la U.V., kaj estas cititaj nur en la Ekzercaro. Cetere pri la senco de **nenial** ekestis dubo: *nenial mi venos* povus teorie signifi aŭ: *mi ne venos, ĉar mi havas por tio nenian motivon*, aŭ *mi venos, kvankam mi ne havas por tio motivon*. Evidente la analogio kun la aliaj nen-vortoj puŝas al la unua signifo.

Pluformado: *la kialo de tiu decido*.

4. **Maniero**. La iel-vortoj montras esence la manieron; ili servas ankaŭ por montri la gradon de iu kvalito (ĉe adjektivoj), ĉar tiuj du nuancoj estas preskaŭ nedistingeblaj. Tial ili estas regule kaj logike uzataj ĉe la komparativo: *mi estas tiel forta, kiel vi*^z.

Iel tamen faras escepton: ĝi estas uzata nur en manierindika senco: *neniu havas la rajton iel tuŝi vian kapon*^z; *ĝi sentis sin iel malvigla, io mankis al ĝi*^z (= ĝi en ia maniero, malklare sentis sin...). Por gradindiko oni uzas **iom**.

Male **kiel** estas tre vaste kaj diverssence uzata. Same kiel la aliaj ki-vortoj, ĝi havas la du bazajn funkciojn de demanda aŭ ekkria adverbo kaj de subjunkcio, krome ĝi povas signifi jen la manieron, jen la gradon:

a) demanda maniera adverbo: *kiel vi fartas?*

aa) demanda grada adverbo: *kiel alta vi estas?*

b) ekkria maniera adverbo: *kiel li kuras!*

bb) ekkria grada adverbo: *kiel bela vi estas!*

c) manier-indika subjunkcio: *kiel mi aŭdis, li mortis* (vd. § 261);

cc) kvalitkompara subjunkcio: *ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj*^z (vd. § 262).

Kompreneble, la demanda adverbo povas ankaŭ enkonduki nerektan demandon:

a') *rigardu, kiel li kuras!*

aa') *terure, kiel malsata li estas!*

Sed, krom tiuj larĝaj uzoj, **kiel** estis elektita de Z. por ludi tiun apartan rolon de la partikulo destinita por enkonduki komparon. La rolo de tiu partikulo estas grava en ĉiuj eŭropaj lingvoj, sed pri ĝia karaktero regas plena malakordo inter la gramatikistoj. Ĝi havas efektive funkcion mezan inter tiu de prepozicio kaj tiu de subjunkcio: ĝi similas prepozicion per tio, ke normale ĝi servas por enkonduki substantivon kaj ne subordinigitan verbon: *li parolis kiel prezidanto; li estis pala kiel neĝo* ktp. (Evidente, oni ofte povas aldoni ian verbon al tiaj frazoj, sed ne ĉiam: en la unua ekzemplo tio ne estas ebla sen ŝanĝo de la signifo; kaj krome neniu parolanto efektive pensas verbon ĉe tiaj frazoj); aliflanke ĝi similas subjunkcion per tio, ke en kelkaj tute similaj frazoj estas esprimita ia verbo (Kp. *mi amas lin pli ol vin kaj mi amas lin pli ol mi vin amas*) kaj per tio, ke la sekvanta substantivo varias kaze, kvazaŭ ĝin nevideble

influus la neesprimita verbo (Kp. *li estis akceptita kiel savanto kaj oni akceptis lin kiel savanton*). Tiun kompleksan funkcion de prepozicio-subjunkcio ni detale pritraktos sub §§ 169, 175, 256 kaj 262. Sed ni jam rimarkigas, ke **kiel** estas la sola, inter la ceteraj ki-vortoj, kiu povas plenumi tian funkcion (Kp. § 262 A. 3).

Rim. VI. En la unuaj jaroj de la lingvo ankoraŭ ne ekzistis la vorto **kvazaŭ**: tial Z. kaj aliaj aŭtoroj uzis **kiel**, aŭ **kiel se** en ties senco: *ĝi elrigardis, kiel* (= ĝi aspektis, kvazaŭ) *la supro kaj la radikoj ludus inter si* (Fundamenta Krestomatio, p. 37).

Pluformado: *tiela* (vd. § 81 Rim. II.); *tiele* (uzata interalie, inter krampoj kaj antaŭ krisigno, por montri, ke stranga formo en teksto ne estas preteratento aŭ preseraro, sed ĝusta citaĵo); *iele tielez*.

5. Kvanto. La iom-vortoj montras esence la kvanton aŭ la mezuron: *kiom da kapoj, tiom da opinioj^z; neniom da filoj, neniom da amikoj!^z; ne vidante, kiom da ridinda estas en ĝi^z*. Sed ĉar kvanto aŭ mezuro en metafora senco estas io tre proksima al grado de intenseco, ili estas ankaŭ uzataj por esprimi ĝin ĉe verboj: *persistecon ŝi tiom, tiom bezonis!^z ili permesis fumi tabakon tiom, kiom ĝi servas al la sano; tio absolute neniom pligrandigas la libron^z*. Fine ili estas uzataj por akcenti la neegal-econ de la neegaleca komparativo: *iom pli granda; lia subfosado estas tiom pli danĝera, ke...^z; kiom pli bona estas via amo, ol vino!^z li revenis neniom pli saĝa*.

Diference de la ceteraj i-vortoj, **iom** havas apartan senco kaj montras kvanton ja ne precize difinitan sed tamen sufiĉe grandan por esti taksata aŭ konsiderata: kontraste kun **malmulte**, kiu havas negativan senco, **iom** havas pozitivan; kp. *li faris malmulte da eraroj* (laŭdo!) kaj *li faris iom da eraroj* (mallaŭdo!). Pro tiu aparta nuanco, ĝi, malsimetrie kun la aliaj iom-vortoj, estas uzata ankaŭ por esprimi gradon de kvalito ĉe la adjektivoj (ĉe kiuj iel ŝajne insistas pri la maniero), same kiel gradon de intenseco ĉe la verboj: *li estas iom diligenta; li iom laboras*.

Tiom... kiom... estas la korelativoj uzataj por esprimi la kvanton aŭ la intensecon. Zamenhof plurfoje uzadis akcentitajn formojn: *tiom multe, kiom multe, tiom same*, ĉe kiuj *multe* aŭ *same* ludas nur emfazan rolon: *tie estis tiom multe da siringoj; ne ĉiuj scias, kiom multe nia afero ŝuldas al nia kara foririnto; ĝi sciis pli ol la gardisto kaj preskaŭ tiom same kiel mi* ktp. Estas do okazo tute malsimila, malgraŭ supraĵa simileco, al jena: *kiom alte ŝi saltis?*, en kiu ekzemplo **kiom** determinas la sekvantan vorton *alte*.

Rim. VII. La uzo de **tiom** por esprimi gradon, nomata de de Hoog *kiom-malsano*, estas tute ne-zamenhofa; ĝi havas krome du malavantaĝojn: unue, kiel trafe diras de Hoog, la fonetika valoro de *-om* estas multe pli peza ol tiu de *-el*, tial teksto kun multaj kiel-oj restas flua kaj facile elparolebla, dum la sama teksto kun kiom-oj sonas peze, "morne"; due, uzante ĉiam **tiom... kiom...**, oni perdas la eblon apliki ilin en la okazo, kiam oni bezonus ilin por esprimi nuancon. Du tiaj okazoj estas: a) se oni volas aparte emfazi la esprimon: *la esperantistoj tute ne pretendas, ke ilia lingvo prezentas ion t i o m perfektan, ke nenio pli alta jam*

povus ekzisti^z (la substreko de *t i o m* estas de Zamenhof mem); b) se oni volas eviti miskomprenon pro la kroma kompareca signifo de *kiel: li estas, kiel verkisto, tiom inteligenta, kiom stulta, kiel financisto* (Kp. § 262, Rim. IV.). Sed tiaj okazoj, kompreneble, estas esceptaj kaj prezentas sin tre malofte.

Kiom, antaŭ **eble**, ne havas la saman signifon, kiel la paralela *kiel: per kiel eble plej* oni esprimas la plej altan gradon de superlativo: *venu kiel eble plej rapide* signifas: *venu kun la maksimuma rapideco*. Male *kiom eble* havas la nuancon de limigo: *venu kiom eble rapide* signifas: *venu rapide, sed nur tiel rapide, kiel vi povas*. Kp.: *ĉiuj uzu la novajn vortojn kiom eble egale^z; ni decidis kiom eble ĉion fari mem^z*. Kp. § 261.

Pluformado: *iomete; tioma; kioma* (vicdemandaj, vd. § 84 kaj 87 I.).

Rim. VIII. Same kiel pri la unua tabelo (§ 85), ni povis konstati pri la ĉi-supre montrita tabelo, ke simetrio senca ne plene respondas al la simetrio forma. La lingvaj analogioj kaj psikologiaj tendencoj ludis ankaŭ ĉi tie ian perturban rolon.

Aŭ-adverboj

Zamenhof, prave aŭ malprave, opiniis necesa, ke certaj adverboj havu nevarian finaĵon, kiu ĉe la finaĵa pluformado povas esti konservata, do ne elfali kiel la ordinaraj finaĵoj. Tion li solvis per la elpenso de la fino **aŭ**, kiun oni trovas en la sekvantaj adverboj:

Tempo: *ankoraŭ, baldaŭ, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ*.

Maniero: *adiaŭ, almenaŭ, ankaŭ, apenaŭ, kvazaŭ, preskaŭ*.

Rim. I. En sia letero al Borovko, Zamenhof parolas pri la "neŭtrala sed difinita finiĝo *aŭ*". Tiu neŭtraleco signifas, ke li uzis tiun finon ne nur por adverboj, sed por vortoj, kies naturon li ne volis precizigi, kaj kiujn oni povas uzi laŭ diversaj gramatikaj kategorioj. Sed efektive, ekzistas nur du aŭ-adverboj, kiuj funkcias ankaŭ kiel subjunkcioj: *kvazaŭ* (vd. § 263) kaj *apenaŭ* (vd. § 247 ĉe-fine); kaj, aliflanke, ekzistas nur du *aŭ*-prepozicioj, kiuj povas havi kvazaŭ-adverban rolon: tio estas *antaŭ* en la komplekso *antaŭ ol* (= antaŭe ol), kaj *ĉirkaŭ*, se ĝin sekvas numeralo (*ĉirkaŭ tri homoj*). Sed la malhavo de aŭ-finaĵo, ne malhelpas al **dum** havi tri funkciojn (subjunkcio, konjunkcio, prepozicio), nek al **ĝis** roli same kiel antaŭ ĉe numeralo. Kp. § 296, Rim IV.

Rim. II. En 1892 Z. proponis jenan ŝanĝon: "Anstataŭ la finiĝo "aŭ" en diversaj vortoj oni povas uzi apostrofon... Ankaŭ tio ĉi levos la bonsonecon, ne enkondukante ian konfuzon (ĉar "aŭ" ne apartenas al la radiko, sed estas nur kondiĉa finiĝo, tiel same facile forlasebla, kiel "o" en la substantivo)." Sed tiu elizio de "aŭ" ĉe la adverboj ne estis praktikita; nur en la lasta tempo kelkaj poetoj provis uzi ĝin en la versoj.

Ĉar neniu el la aŭ-adverboj montras lokon, ili ne povas stari en akuzativo.

Komparacion povas havi nur *baldaŭ: venu plej baldaŭ!*

Rilate la uzon, jen kelkaj pluaj detaloj.

Ankaŭ estas emfaza adverbo, signifanta, ke al jam donita ago aŭ stato aldoniĝas alia tute komparebla: *kiu al si mem helpas, al tiu ankaŭ Dio helpas^z; ankaŭ ŝi estas nomata Amelio^z; tio ĉi ankaŭ estas vera^z; Italujo ankaŭ havas siajn grandajn homojn^z; eĉ pri la enmeto de mia infano en*

la gimnazion ankaŭ devas pensi nur mi^Z. Tiu nuanco de komparado evidentiĝas ĉe la duopaj konjunkcioj "ne nur... sed ankaŭ" aŭ "kiel... tiel ankaŭ": la rubando servis kiel por utilo, tiel ankaŭ por ornamo^Z. Kp. § 90 Rim. II kaj § 221.

Ankoraŭ signifas: 1. daŭron, ne-ĉeson de ago aŭ stato ĝis la aktuala momento, kaj eble plue: *Karolo ankoraŭ vivas^Z; la lampo ankoraŭ brulis^Z; ni devas kaj dum longa tempo ankoraŭ devos propagandi Esperanton^Z; li prenis kun si ankaŭ min, tiam* (subkomprenu: estantan) *ankoraŭ dekkvinjaran knabon^Z; ankoraŭ hodiaŭ mi estas tiel forta^Z; vi estis tiel bela, tia vi estas ankoraŭ nun^Z.*

2. plidaŭrigon de stato aŭ ripetigon de ago en la estonteco, rilate al la aktuala momento: *ju pli mi lernas, des pli multe mi vidas, ke mi devas ankoraŭ lerni^Z; kaj tamen ekzistas ankoraŭ savo por ŝi!^Z de la tago restas ankoraŭ multe^Z; li konis ĉiun elpenson, kiu estis farita aŭ ankoraŭ farota^Z; ĉiam ankoraŭ la edzino atendis la redonon de siaj juveloj.*

3. aldonon de nova elemento al la jam ekzistantaj, kun nuanco ne de komparo (kiel ĉe **ankaŭ**), sed de amasiĝo, ripetigo: *li klarigas, ke, krom la forto, kiu troviĝas en la glavo, ekzistas ankoraŭ alia forto^Z; li atendis ankoraŭ aliajn sep tagojn^Z; ankoraŭ unu vorton vi devas aŭdi^Z; ankoraŭ unu fojon ŝi ekrigardis la reĝidon per rigardo duone estingita^Z; krom ne-honesta, mi estus ankoraŭ sendanka^Z; Revizoro el Peterburgo, inkognite – kaj ankoraŭ kun sekreta ordono!^Z*

4. insiston pri la atingo de nova ŝtupo en serio aŭ evoluo: *ili ankoraŭ pli ekzercis sin^Z; ŝi miris ankoraŭ pli, kiam ŝi vidis lian fizionomion^Z; la infano estas ankoraŭ pli pala, ol hieraŭ; mi ne povas nur laŭdi, kiam oni trouzas tiujn vortojn, aŭ ankoraŭ pli, kiam oni volas uzi ilin ĉiam^Z.*

5. neatenditecon de ia limpunkto en la tempo aŭ spaco: *vi estas jam mortepala, ankoraŭ antaŭ ol vi scias la plej malmulton!^Z; mia plej maljuna filo estas naskita de mi ankoraŭ antaŭ la edziĝo^Z; mi devas iri, ĉar miaj novaj gemastroj hodiaŭ ankoraŭ min bezonas^Z; sed ankoraŭ hodiaŭ en la nokto povas ja fali hajlo kaj ĉion forbati^Z. Kp. eĉ kaj jam.*

Ankoraŭ ne signas nekomenciĝon de stato aŭ ne-okazon de ago ĝis la aktuala momento (neado de **ankoraŭ** 1⁰): *la glacio ne estis ankoraŭ sufiĉe forta, por ŝin transporti^Z; ankoraŭ neniam mi vidis lin^Z; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas^Z; mi ĝin ankoraŭ ne scias. Vd. § 90 Rim. IV. Pri la loko de la negacio, vd. § 273.*

Apenaŭ montras ne-atingon, nesufiĉecon, dum **preskaŭ** montras atingon, sed ne plenan, nur proksimuman: *tiun junan homon ŝi preskaŭ tute ne konis, ĉar ŝi apenaŭ kelkajn fojojn lin vidis^Z. Preskaŭ* estas do pozitiva, kaj **apenaŭ** negativa; tial **apenaŭ** estas ofte sinonimo de "preskaŭ ne": *ĉu ni ne havis tian someron, ke ni preskaŭ ne povis spiri?^Z la malfeliĉa imperiestro apenaŭ povis spiri^Z. Pri apenaŭ subjunkcio, vd. § 247.*

Nesimetriaj adverboj

90

Z. lasis kelkajn adverbojn en ilia nacilingva formo kaj ne donis al ili simetrian formon; temas cetere nur pri unusilaboj:

Loko: *ĉi, for*.

Tempo: *jam, ĵus, nun, plu, tuj*.

Maniero: *ajn, ĉu, do, eĉ, ja, jen, jes, mem, ne, tre*.

Kvanto: *ju... des..., nur, pli, plej, tro*.

Rim. I. Inter la nesimetriaj adverboj komence klasiĝis **kvankam**. Tie hodiaŭ oni povus klasi ankaŭ **ek**, dis kaj **re**, el kiuj precipe **re** estis jam prove uzata sen finaĵo: *la laboristoj venis de la kamparo re*. Same **retro** (vd. § 362).

La **u z a d o n** de pluraj el ĉi tiuj adverboj ni pritraktas en aliaj lokoj; oni elserĉu tiujn lokojn el la Indekso. Ĉi tie ni devas okupiĝi pri la jenaj:

Eĉ havas kvar signifojn:

1. neatendita aldono (tre insista **ankaŭ**): *ne nur... sed eĉ...; li donis al vi konsilon, protekton, eĉ monon; li havas nenion, eĉ ne pecon da pano; eĉ sur la suno troviĝas makuloj^Z; mi ne diros eĉ unu vorton^Z*.

Rim. II. Pro la mallongeco de **eĉ** oni ofte estas tentata ĝin uzi anstataŭ **ankaŭ**, eĉ kiam tiu senco de neatenditeco mankas. Tio estas misefekta: *mi alportis donacon eĉ al vi* – signifas, ke *vi* ne meritas, ne povis atendi de mi donacon, tamen mi alportis; do oni ne povas diri *eĉ al vi* anstataŭ la simpla *ankaŭ al vi*.

2. "malgraŭ atendo" (pli insista **ankoraŭ**): *ĉi tiu ĉambro estas eĉ pli granda; mi sentas min eĉ pli malbone ol antaŭ la kuracado*.

3. malgraŭeco (koncedo): *eĉ kun via helpo mi ne sukcesis* (malgraŭ ke vi min helpis).

4. post negacio: "kontraŭe": ekz-e: *li ne estas geniulo; eĉ, oni povas lin nomi simpla idioto; li ne estas antialkoholisto, eĉ!*

Rim. III. Oni povus ĝin uzi ankaŭ por jese respondi al nea demando: *ĉu vi ne venos? – Eĉ!* Tiel ne necesus ripeti la demandon: *jes, mi venos*. Oni trovas ankaŭ tamen en tiu funkcio; sed atentu pri § 91, Rim. V.

For signifas jen "malproksime" kaj montras pozicion: *la knabo serĉis, sed la pilko estis kaj restis for^Z;*

jen "malproksimen" kaj montras movon: *for el la urbo!^Z li pafis sin for^Z*.

De tiu dua senco venas la metafora senco de formeto, malembaraso, neniigo: *for la manojn!^Z for la batalilojn! for la neŭtralismon!* En tiuj frazoj, la akuzativon klarigas ia subkomprenita verbo: *forĵetu* ktp. Sed oni povus tute egale rigardi la substantivon kiel la subjekton de la predikato "for", kaj uzi la nominativon: *for ĉiuj bedaŭroj!* La akuzativo estas tamen pli drasta.

Jam havas multajn nuancojn, kiujn precize difini ne estas ĉiam facile. Tiu adverbo esence "enhavas en si la ideon de ŝanĝo de stato" (Z.): tial ĝi estas iel la malo de **ankoraŭ**, kiu montras, ke ŝanĝo ne okazis: *multaj el ili vivas ankoraŭ... sed, ho ve, multaj el niaj pioniroj jam ne vivas^Z*. Pli detale, **jam** signas:

I. ke daŭra ago aŭ stato estas komencita (= de nun, de tiam): *la libro jam estas preta; li jam laboris; jam estas tempo iri domen^Z*. El tiu baza signifo venas ĝia uzo

a) por signi, kun akuzativa tempadjekto, la komencon de la daŭro: *mi laboris en la magazeno preskaŭ jam kvin jarojn^Z* (= de antaŭ kvin jaroj); *nun jam du jarojn daŭras la malsato^Z*;

b) por signi, ke la sekvanta adjektivo aŭ adjekto estas stato rezultinta de la ago: *lia multajare ellaborita projekto ricevis jam precizajn, difinitajn formojn^Z*; *ni iras al nia celo jam kun plena trankvileco^Z*; *tiun ĉi lokon (de letero) oni povas forlasi, poste ĉio estas jam legebla^Z*;

c) por signi, ke la stato ekzistas kaj ne dependas de la interveno de nova faktoro (= tuj, sen plua atendo, senplie): *la penso de la homa koro estas malbona jam de lia juneco^Z*; *ŝi devis rifuzi, ĉar (ne restas multe da mono kaj) la provizo da ligno estis jam tre malgranda^Z*; *jam sen la heredaĵo li povis bone vivteni sin; permesu jam al mi...^Z*.

II. ke momenta ago okazis, sekve finiĝis (= antaŭ nun, antaŭ tiam): *li jam foriris; ĉu vi jam trovis vian horloĝon?^Z mi jam kelkajn fojojn rimarkigis tiun ĉi al vi^Z; rapidu: ĝis vespero li jam devas troviĝi sur la maro^Z*; *komencis jam vesperiĝi^Z*. El tiu baza signifo venas ĝia uzo

a) por signi tempon perfektan: *la kuracisto venis, kiam li jam mortis; kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita^Z* (vd. § 247 b).

III. ke momenta ago okazos post pli-malpli longa atendo: *kun la tempo ili jam solidiĝos; jam (= finfine) venos al mi en la kapon io!^Z*

Jam ne neas la unuan sencon, kaj signas: 1^o ke daŭra ago aŭ stato ĉesis: *li jam ne vivas* (= li plu ne vivas); 2^o ke atendata ago ne okazos: *li jam ne venos* (vd. ĉi-sube Rim. XI).

Rim. IV. Oni trovas ne malofte la formon **ne jam** anstataŭ **ankoraŭ ne**. Teorie oni povas tion travigi, ĉar dirante ekz-e: *li ĝin ankoraŭ ne faris* – oni ja neas, ke li ĝin jam faris. Tamen, Z. konsilis ne uzi tiun turnon, kaj lia konsilo ŝajnas obeinda; apud la unusilaba, senakcenta **jam** la loko de **ne** ne povas havi tian gravan signifon sen danĝero de momenta miskompreno.

Jen. Ĝia signifo estas proksimume: *rigardu!* Krom ĝia proprasenca uzo, rimarkinda estas ĝia emfaziga funkcio: *jen kion mi proponos! jen kial mi venis! jen kiel mi faros la taskon! jen kia li estas!* anstataŭ la simplaj, senemfazaj ti-vortoj: *tion mi proponas* ktp. (kp. § 55).

Ĵus signifas: momenton aŭ kelkajn momentojn antaŭ la aktuala momento: *li ĵus foriris*. Pro tiu senco, ĝi nepre certigas la finon de la ago (tempo perfekta), do post **ĵus** estas superflue uzi kompleksajn verbo-tempojn (vd. § 100 kaj 271 a).

Rim. V. Oni kelkfoje trovas **ĵus** uzata kun la senco: *en la nuna (tiama) momento*. Tio estas nekorekta. Ankoraŭ pli nekorekte estas uzi ĝin en la senco: *precize*. En tiuj ambaŭ sencoj oni uzu **ĝuste**: *li foriris ĝuste, kiam mi alvenis* (samtempaj agoj); *li foriris ĵus, kiam mi alvenis* (li foriris momenton, antaŭ ol mi alvenis); *li estas ĝuste tiu, pri kiu temas*. Kontraste kun *tuj*, **ĵus** do ne estas uzata mefafore. Anstataŭ *ĵus kiam, ĵus antaŭ* oni uzu *ĝuste kiam, ĝuste antaŭ*.

Kvankam, tute same kiel kvazaŭ, povis en la komencaj tempoj de la lingvo, ricevi, krom sia propra subjunkcia valoro, ankaŭ ian adverban rolon, kun la signifo "ja, verdire, sendube, konfesinde": *li estis kvankam konvinkita, ke li pro si ne devas timi, tamen li preferis antaŭe sendi alian personon^z; se tio ĉi (ludmaniero) estas trograndigata, tio povas kvankam elvoki ridon ĉe la mallertuloj, sed la kompetentan homon ĝi forte ĉagrenas^z*. Sed post sia traduko de Hamleto, Zamenhof rezignis tiun slavismon, kaj neniu ĝin subtenis.

Mem havas tri ĉefajn signifojn: 1. proprapersono: *nun la reĝo mem volis ĝin vidi^z; mi povas fidi min mem^z*. De tiu senco venas la uzo de **mem** por meti du personojn, aĵojn ktp. en kontrasto: *ĉiun demandu, sed mem al vi komandu^z; mi mem ankaŭ tion pensis^z*.

2. per la propra ago, sen helpo de iu alia: *prenu mem akvon, se vi volas trinki^z; sed mi ja mem venis al tiuj ideoj, per mia propra saĝo^z*.

3. per la propra volo, sen ia ekstera trudo: *ne pelu tiun, kiu mem forkuras^z; la maljunulo jam bedaŭras la trorapidan paŝon, kiun li tamen, ŝajnas al mi, ne mem faris^z*.

Nur. Ĝi havas du signifojn:

1. *ne pli ol*. Ekzemple: *nur du homoj venis; nur mi promenis tie* (neniu pli); *mi nur promenis tie* (nenion alian faris); *mi promenis nur tie* (en neniu alia loko). En tiu ĉi senco oni povas uzi ankaŭ **sole** (kp. § 197, Rim.).

2. *ne pli (mal)frue*. Ekzemple: *mi revenos nur je la oka; mi atendas nur ĝis dimanĉo*.

Nur staras ĉiam antaŭ la vorto, al kiu ĝi rilatas.

Rim. VI. Por eviti konfuzon inter la du sencoj, estas konsilinde uzi apud tempesignifaj vortoj ĉiam **sole** por esprimi la unuan sencon kaj rezervi **nur** por la dua senco. Do: *li venos sole dimanĉe* (en neniu alia tago); *li venos nur dimanĉe* (ne pli frue). Per tio iĝas nenecesaj la proponoj (cetere senŝancaj) pri *erste* kaj *maljam* por la dua senco, kiun cetere oni povas nepriigi ankaŭ per **jam**: *li venos jam nur dimanĉe*.

Rim. VII. **Nura** ne signifas **sola**, **ununura**, **unika**, sed ĝi esprimas senesceptecon aŭ senmiksecon, do ĝia senco estas preskaŭ: *pura*. Ekzemple: *tie estis nuraj esperantistoj* (neniu alispeca almiiksiĝis); *li faris tion el nura kaprico* (nenia alia kaŭzo ludis rolon).

Plej estas uzata: a) por signi superlativon (vd. § 73);

b) kiel ordinara adverbo: *el siaj filoj li plej amas Peĉjon*; ofte oni uzas ankaŭ **pleje**.

Rim. VIII. Se superlativa adjektivo iĝas substantivo, "plej" ordinare iĝas "plejgranda": *plej malagrable – plej granda malagrablejo*. Sed ankaŭ **pleja** estas uzbla: *plej densa – pleja denso*.

Tre altan gradon oni esprimas per kiel eble **plej**.

Pri **malplej** validas la samo.

Pli estas uzata: a) por signi komparativon (vd. § 71);

b) kiel ordinara adverbo: *se vi sciŭs, kiu li estas, vi lin pli estimus^z; pli*

kaj pli (grade pli); **plie** preskaŭ neniam estas uzata en tia senco.

Rim. IX. **Plie** havas du signifojn: 1. *krome: plie, li diris, ke...* 2. *preferere* (kiam ne temas pri subjektiva prefero): *tio estas plie eraro ol peko.*

c) kiel substantivfunkcia kvantesprimo (**pli multe**): *mi ricevis pli da mono ol vi; ses estas pli per du, ol kvar;*

d) kun la a-finaĵo, en preskaŭ vicmontra signifo: *unu plia malagrablaĵo* (= kroma).

Plu signas, ke ago aŭ stato ne ĉesas, sed daŭras plu trans la aktuala momento (*li skribas plu*) aŭ loko (*li iris kelkajn paŝojn plu*). En loka senco ofte oni uzas **plue**. Pri la evitindeco de **pluen** vd. § 192, Rim. II.

Plu ne aŭ ne... **plu** signas, ke ago aŭ stato, ĝis nun (aŭ ĝis tiam) okazanta aŭ ekzistanta, ĉesis.

Rim. X. Inter **plu** kaj **ankoraŭ** (punkto 1 kaj 2) ekzistas nur nuanca diferenco: **plu** insistas plie pri la futura, **ankoraŭ** plie pri la ĝis-aktuala daŭro. Sed **plu** ne estas uzebla anstataŭ **ankoraŭ** en la signifo sub punktoj 3-5.

Rim. XI. Inter **plu ne** kaj **jam ne** (punkto 1) apenaŭ ekzistas diferenco: *li jam ne vivas kaj li ne vivas plu* estas samsignifaj. Sed rilate al momenta, futura ago la diferenco estas akra: **plu ne** signas, ke ago ĝis nun plurfoje okazinta ne okazos: *li plu ne venos*; **jam ne** signas, ke unufoja ago atendata ne okazos: *li jam ne venos* (= li rezignis pri veno).

Rim. XII. Inter **plu** kaj la adverba **pli** ofte estas nur nuanca diferenco: *la afero plu klariĝos* (la klariĝado daŭros, ne ĉesos); *la afero pli klariĝos* (iĝos pli klara). En la unuaj jaroj **pli** estis ofte uzata anst. **plu**: *la raketoj sin ne levadis pli* (= plu) *en la aeron².*

Tuj proprasence signifas: "senprokraste, sen perdo de tempo" kaj estas uzebla kun ĉiuj verbotempoj: *mi tuj divenis, ke ĝi certe venas de vi²; malfeliĉo sin ne ĝenas, faru geston – ĝi tuj venas²; mi iros tuj raporti al la reĝo²; la asocio uzandos la komunikaĵojn tuj kiam eble².* Metafo- re, ĝi estas ankaŭ uzata pri la spaco, kun senco "tute apude, sen granda interspaco": *mi estis tie ĉi proksime tuj post la pordego²; la granda urbo trovis sin tuj sur la bordo de la maro².*

Neado kaj jesado

91

I. Ĉia ideo povas esti prezentata kiel reala aŭ nereala. Tion oni faras per specialaj adverboj.

A. Negacio. La neadon oni esprimas per la adverbo **ne**. La neado povas koncerni aŭ la tutan propozicion, aŭ nur parton de propozicio. Se temas pri neado de unu frazero, la adverbo **ne** ĉiam staras senpere antaŭ ĝi: *ne mi vidis la patron* (iu vidis lin, sed ne mi); *mi vidis ne la patron* (mi vidis aliajn personojn, sed ne lin). Komparu jenajn zamenhofajn frazojn: *ne vi tion ĉi faris! respondo venis ne tuj; ne ĉiu bojato estas ŝtelisto; vi tute ne bezonas fari al vi tiun klopodon; tamen la instinkto de memkonservo videble ne tute ŝin forlasis.*

Se temas pri la neado de tuta propozicio, la adverbo **ne** staras ordinar- e antaŭ la verbo: *mi ne vidis la patron; ne iru!* Tamen, kiam temas pri

la verboj esti kaj **devi**, la negacio estas regule metata antaŭ ili, eĉ se la neado koncernas efektive la predikativon, kiu sekvas esti, aŭ la infinitivon, kiu sekvas **devi**: *vortojn, kies elfjetindeco ne estas ankoraŭ por ni tute certa^z; la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi^z; mia ora ringo ne estus tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi^z; morti li ne devas!^z ni ne devas malplaĉi al li^z.*

Rim. I. La ne plenan simetrian de kelkaj lingvaj elementoj oni do povas ankoraŭ konstati ĉe la modaj helpverboj. Dum oni klare distingas: *li ne povas kanti* (= li ne havas tian povon, rajton) kaj *li povas ne kanti* (li havas ja la povon, sed rajtas ne uzi ĝin), tia distingo ne ekzistas, ĉe la zamenhofa uzado, kun **devi**: *li ne devas morti* signifas (vidu ĉi-supre): *lia devo estas, ke li ne mortu*, dum la neado de la devo mem estas esprimata per: *li ne bezonas morti* aŭ: *ne estas necese, ke li mortu*. Kaj pri la tria verbo, estas evidente, ke nur nuanceto dividas *li ne volas morti* kaj *li volas ne morti*. Kp. §§ 116 kaj 273.

B. Duobla negacio. La adverbo "ne" sufiĉas per si mem por nei; se do oni enmetas alian nean vorton (kiel **neniu**, **nenia**, **neniam**, ktp.) en la saman propozicion, la du negacioj detruas sin reciproke, kaj la propozicio refariĝas pozitiva: *ŝi ne povis ne vidi* (= ŝi ja vidis), *ke ŝi vekis kompaton en ĉi tiu virino^z; li petis ne sen timo kaj tremo* (= kun timo); *tio ne kostis neniom* (= kostis multe).

Same estas pri la neado de la formulo "ne sole... sed...": *vi ne sole ne faros agon justan, sed vi ankoraŭ ne forigos sur la terpeco la kaŭzon de estonta batalo^z.*

Rim. II. Kiam du negaciaj tabel-adverboj ŝajnas stari en la sama propozicio sen detruo de la negacia valoro, tiam temas pri elipsa kuntiro de du apartaj propozicioj: *vi neniel povas malhelpi min, en nenia maniero^z; neniam, nenie mi vidis tian homon.* (Vd. § 218, Rim. II.).

Rim. III. Tamen, en kelkaj esceptaj okazoj, oni trovas ripeton de neaj vortoj sen detruo de la neado, sed male kun nea emfazo: *tiam ni malutilon alportus al nia afero grandan, kaj utilon ni alportus al neniun neniun^z.*

Tia emfazo pli ofte renkontiĝas ĉe Zamenhof ĉe la duobla **nek**: *restis nenio absolute, nek por mordi, nek por gluti; Esperanto estas nenies propraĵo, nek en rilato materiala, nek en rilato morala.*

C. La realecon de ideo oni ne bezonas indiki per apartaj rimedoj; sed akcenti ĝin oni iafoje bezonas: oni tiam uzas la adverbon **ja**. Tiu adverbo normale staras post la vorto, kiun ĝi emfazas: *mi ja estas pli scianta, ol ŝi^z; la homoj ja ne povas vivi en la maro^z; ha, mallerta urso! vi pafis ja preter la arbo!^z kaj la afero nin ja ne tuŝas^z.*

Iafoje tamen Zamenhof metis ĝin komence de la propozicio, por escepta emfazo: *ja se vi agos bone, vi estos forta; ja la ĉielo... ne povas Vin ampleksi!* (ambaŭ ekz-oj bibliaj).

II. Respondi al demando oni povas per ripeto de la verbo, kun aŭ sen negacio, laŭ la senco: *ĉu vi venos? – mi venos, aŭ mi ne venos.* Sed ordinare oni uzas, por tiaj respondoj, mallongigajn partikulojn, kiuj staras meze inter adverboj kaj interjekcioj.

A. La **j e s a d o n** oni esprimas per **jes**: *ĉu vi venos? – jes.* Post neanta

demando oni uzas **sed jes: ĉu vi ne venos? – sed jes!** Aŭ oni jesas tiaokaze per **jes ja** kaj la ripeto de la subjekto kaj predikato: *ĉu vi ne faris vian taskon? – jes ja, mi faris.* Ĉi lasta esprimo estas pli emfaza.

Rim. IV. Jes ordinare jesas tutan frazon, kio pruvas, ke ĝi ne estas propre adverbo. Tamen, oni ne povas riproĉi la pli kaj pli disvastiĝantan kutimon, ke oni anstataŭigas per **jes** en kunorditaj prop-oj adversaj (vd. § 223) la predikaton de la unua prop-o, elipsan en la dua: *mi ne trinkas brandon, sed vinon jes; stato ne povas konsisti el kelkaj dekoj da personoj, sed jes el kelkaj centoj; vi ne konas lin, sed mi jes.*

Sed uzi **jes** antaŭ verbo (*mi jes kredas; ĝi jes estos preta*) ŝajnas neaprobebla; tio eble devenas el konfuzo inter la germana *ja* kaj nia *jes*. Oni, por emfazo, uzu tiaokaze *ja: ja mi kredas; ja ĝi estos preta!*

B. La **ne** e **ad** **on** oni esprimas per **ne**, kiu, en ĉi tiu dua uzmaniero, ŝajnas perdi sian adverban karakteron: *ĉu vi venos? – ne.* Same kiel **jes**, **ne** povas anstataŭi la predikaton de antaŭa prop-o: *neniu devas tion scii, mia frato ankaŭ ne!*^z

La duobla signifo de tiu sama vorto, jen adverbo, jen interjekcio, aperas en jena ekzemplo: *pagu, kaj mi helpos; se ne, ne.* Ĝi povas estigi konfuzon en kelkaj frazoturnoj: *"tiu libro certe estas io abomena. – ne legu ĝin!"* aŭ *"ne, legu ĝin!"*. Kp. ankaŭ: *Sara malkonfesis, dirante: mi ne ridis; ĉar ŝi timis; sed ili diris: ne, vi ridis?* (ne konfuzu kun: *ne vi ridis!*). Oni devas tiam zorge interpunkcii, kaj en la parolo zorge apartigi la respondajn **ne** per silento. Cetere, por eviti tiajn konfuzojn, estus oportune uzi kun la interjekcia signifo la radikon **nen** de la neaj tabel-vortoj: *se ne, nen!*

Rim. V. "La uzado de interjekciaj **jes** kaj **ne** prezentas vere gravan, kaj tamen malfacile solveblan problemon por internacia lingvo" (K. Ossaka). Efektive, ĉe nea demando la respondo per simpla interjekcio povas havi malajn signifojn, laŭ la nacilingvaj kutimoj. Ekz-e sanulo demandita: *"ĉu vi ne estas malsana?"* respondos per **ne**, se li estas eŭropano, per **jes**, se japano. La subkomprenita penso estas por la unua: *"ne, mi ne estas malsana"*; por la dua: *"jes, via neado estas ĝusta"*. Tiu japana pensmaniero troviĝas eĉ ĉe slavaj aŭtoroj: la tekston anglan de Hamleto:

– *Why, then the Polack never will defend it?*

– *Yes, it is already garrison'd.*

Zamenhof tradukis:

– *La poloj sekve ĝin eĉ ne defendos?*

– *Ho ne, ili kolektis jam soldatojn.*

Same: *ĉu ŝi ne edziniĝis? demandis Marta. – Jes, iele tiel fariĝis, ke... ŝi ne edziniĝis?*^z.

Pri **nek** vd. §§ 123 kaj 85, Rim. III.

Derivitaj adverboj

92

La derivitaj adverboj estas riceveblaj per aldono de la disigebla finaĵo *-e* al ĉia signifaŭga radikoj.

El la plej uzataj adverboj, kelkaj devenas de adverbaj radikoj, kiuj jam kuŝas en la ĉi-supraj kategorioj (plie, fore, tiele), aŭ kiujn **Z.** ial ne klasis

en ilin: *oft-e, parker-e, supr-e, laŭt-e, nepr-e, spit-e*.

La plej oftaj devenas aŭ de prepoziciaj: *antaŭe, apude, dume, ekstere, kontraŭe, kune, poste, sube, supere*, aŭ de adjektivaj radikoj: *dekstre, due, eble, efektive, facile*, ktp., ktp.

Sed oni povas derivi adverbojn ankaŭ el substantivoj: *home, matene, nokte, pasie*, aŭ el verboj: *parole, skribe, sekve*. Oni povas fine fabriki adverbojn el ia ajn grupo da vortoj, kunmetante ilin kun la finaĵo *-e*: *en bona stato = bonstate; ĉiun semajnon = ĉiusemajne; tra la fenestro = trafenestre* ktp...

Ligante adverbojn kun prepozicioj, oni ricevas prepoziciaĵojn: *manke de (sen), supre de* (vd. § 122).

Rim. I. Domaĝe signifas proksimume *bedaŭre*. La verba formo (*domaĝi*) havas sencon parencon al *bedaŭri*, sed dum ĉi lasta rilatas al okazinta perdo, *domaĝi* rilatas al okazonta kaj signifas, ke oni ne volas, evitas fari tiun perdono: *mi domaĝas la monon por tiaj bagateloj*. Oni do ne uzu ĝin en la senco *difekti*. Por tio oni povus uzi *domaĝumi* (kaŭzi, ke oni diru "domaĝe!"), aŭ la neologismon *damaĝi*.

Rim. II. Dume signifas: 1. "dum tiu tempo": *la arbara korniko, kiu dume jam edziĝis, akompanis ŝin tri mejlojn*^z. 2. "ĝis pli ĝusta tempo": *ni dume lasu flanken tiun demandon*^z. 3. "malgraŭ ekzistanta fakto": *pli ofte ili tion ne faru. Dume, ili ricevos rekompencon*^z. Kp. § 223.

Rim. III. Propre estas ofte renkontata en jena signifo: ĝustadire, ĝustasence, en maniero al si propra. Tion iuj malkonsilis, sed *Z.* mem uzis: *pri tio propre ni ne bezonas paroli*^z. Tial, kaj pro la plena internacieco de tia uzmaniero (lat., angla, franca, itala, germana, hungara, pola, ktp.) oni ne povas ĝin kondamni, precipe, ĉar ĝi neniam povas estigi konfuzon, eĉ malpli ol la du sencoj de *ĝuste* (vd. § 90, Rim. V.).

Rim. IV. Kun *same* oni trovas ĉe *Z.* ĉiam la adverbos *tiel: tiel same*. Simile, li uzas ĉiam *tia sama, tio sama*. En la nuna lingvo ofte, eĉ pli ofte oni trovas la simplajn *same, la sama, la samo*.

Rim. V. Pri sole vd. nur (§ 90 kaj 197, Rim. II.).

Rim. VI. Spite estas adverbo. Do, ne estas ĝuste uzi ĝin prepozicie, kun nominativo; oni formu el ĝi prepoziciaĵon: *spite de^z, spite al^z*. Oni povus uzi ankaŭ *spit' al* analogie al *dank' al*. La akuzativo, kompreneble, povas anstataŭi la prepozicion: *spite ĉiujn argumentojn; konduku min sur ĝusta irejo spite miajn malamikojn*^z. El *spite* devenas la verbo *spiti* (pli ĝuste estus rigardi *spit* kiel verban radikon): *forspiti*^z; *spitema*^z. Kp. § 148, 202 B. c. kaj 258.

La adverboj teorie estas nevariaj. Tamen pluraj el ili povas stari en akuzativo por montri la almovon: *sidi hejme, iri hejmen*.

Ili ricevas la saman komparacion, kiel la adjektivoj:

Absoluta komparacio: *iom, kelke, tre, plej ofte*.

Rim. VII. En tiu okazo, *plej* neniam estas antaŭata de la artikolo: *plej bone estas cedi*.

Relativa komparacio:

a) **k o m p a r a t i v o:** *pli, malpli lerte ol...; same, tiel lerte kiel*.

b) **s u p e r l a t i v o:** *li agis plej lerte el ĉiuj*.

Rim. VIII. En tiu okazo Zamenhof uzadas la artikolon: *vi povas fari, kiel vi trovas por vi la plej oportune*.

LA VERBO

LA FORMOJ DE LA VERBO

- 93** La verbo estas vorto esprimanta agon aŭ staton atribuitan al ia subjekto; kiam temas pri ago, oni ĝenerale indikas ankaŭ, kontraŭ kiu objekto ĝi estas direktita.
- La verbo, ĉefa vorto en la frazo, estas karakterizata per tempoj, modaloj, modoj, voĉoj kaj aspektoj.
- La *tempoj* estas la diversaj formoj, per kiuj oni esprimas la momenton, kiam okazis la ago, ĉu en la estinteco, estanteco aŭ estonteco (en la paseo, nuno aŭ futuro).
- La *modaloj* estas la diversaj formoj, kiujn la verbo alprenas laŭ tio, ĉu ĝi rolas kiel predikato aŭ kiel substantivo aŭ kiel adjektivo.
- La *modoj* estas la diversaj formoj, per kiuj oni esprimas la manieron, laŭ kiu oni prezentas la agon, ĉu oni ĝin konstatas, ordonas aŭ supozas.
- La *voĉoj* estas la diversaj formoj, per kiuj oni esprimas la rilaton inter la ago kaj subjekto, laŭ tio, ĉu la ago estas prezentata kiel plenumata de ĝi aŭ suferata de ĝi, aŭ kaŭzata de ĝi, aŭ reaganta sur ĝin.
- La *aspektoj* estas la diversaj formoj, per kiuj oni esprimas la manieron, kiel oni rigardas la agon, ĉu kiel komenciĝantan, aŭ kiel ne daŭran, aŭ kiel daŭrantan, aŭ kiel ripetiĝantan, aŭ kiel finitan.
- 94** La sistemo de la verbo, kiun oni nomas konjugacio, prezentas en Esp-o tre karakterizajn trajtojn:
1. ekzistas nur unu konjugacio; ĉiuj verboj konjugaciigas idente, eĉ la verbo *esti*.
 2. ne ekzistas, male al ĉiuj eŭropaj lingvoj, kontrasto inter la personmontraj kaj senpersonaj modaloj: en ĉiuj modaloj de la verbo la personojn montras nur la apuda substantivo aŭ pronomo aŭ la frazo-senco. En la du frazoj: *mi vidis lin fali* kaj *mi vidis, ke li falas*, ekzistas nenia morfologia diferenco inter *fali* kaj *falas*; la dua formo montras la personon ne pli ol la unua; ni komprenas, ke temas pri *lin* aŭ *li* nur pro la ĉeesto de tiuj pronomoj, neniel pro la formo de la verbo.
 3. apud la ordinaraj aktiva kaj pasiva voĉoj, oni trovas du aliajn: faktitivan kaj medialan. Krome la Esp-a verbo posedas rimedon por esprimi kvin aspektojn.
- Do, se la morfologio de la verbo estas tre simpla, la nuancado de la verbaj signifoj estas tre detala kaj pli perfekta ol en la eŭrop-okcidentaj

lingvoj: tiu fenomeno estas ŝuldata verŝajne al influo de la rusa kaj de la hebrea lingvoj.

Tempoj

95

Tempoj ekzistas 9: tri ĉefaj kaj ses akcesoraj. La tri ĉefaj tempoj estas: la *prezenco*, esprimanta, ke la ago (aŭ stato) okazas en la estanteco (nuno): *jen mi paŝas, jen mi sidas*;

la *preterito*, esprimanta, ke la ago (aŭ stato) okazis en la estinteco (paseo): *jen mi paŝis, jen mi sidis*;

la *futuro*, esprimanta, ke la ago (aŭ stato) okazos en la estonteco (futuro): *jen mi paŝos, jen mi sidos*.

Sed, anstataŭ esprimi ĝenerale la okazmomenton de ago, oni povas ĝin precizigi difinante la temporilaton inter tiu ago kaj la preparolata stato, kiun la ago estigas: unu povas esti samtempa, antaŭa aŭ posta je la alia. De tio devenas, por ĉiu el la tri supraj tempoj, tri novaj nuancoj, kiujn oni povas nomi rilataj tempoj:

la *imperfektaj tempoj*, esprimantaj, ke la ago ne estas finita, kaj ĝi daŭras kune kun la stato en la nuntempo (imperfekta prezenco: *estas konstruanta, konstruata*), en la paseo (imperfekta preterito: *estis konstruanta, konstruata*), aŭ en la futuro (imperfekta futuro: *estos konstruanta, konstruata*);

la *perfektaj tempoj*, esprimantaj, ke la ago estas jam finita, kiam komenciĝas la stato (perfekta prezenco: *estas konstruinta, konstruita*; perfekta preterito: *estis konstruinta, konstruita*; perfekta futuro: *estos konstruinta, konstruita*);

la *prediktaj tempoj*, esprimantaj, ke la stato antaŭas la agon (predikta prezenco: *estas konstruonta, konstruota*; predikta preterito: *estis konstruonta, konstruota*; predikta futuro: *estos konstruonta, konstruota*).

La samo validas por la statsignifaj verboj, ĉe kiuj la temporilato estigas inter la stato esprimita de tiuj verboj kaj la stato difinita de la cirkonstancoj en la rakonto: *li estas, estis, estos sidanta* (imperfektaj tempoj); *li estas, estis, estos sidinta* (perfektaj); *li estas, estis, estos sidonta* (prediktaj).

Rim. Ni devis krei novan sistemon de nomado por la multaj E-aj tempoj, ĉar la nomoj, kiujn disponigis al ni la nacilingva tradicio, estis nek sufiĉe multaj, nek ĉiam tre konvenaj al la spirito de nia lingvo. Oni rimarkos tamen, ke nia nomenklatureto estas kiel eble plej proksima al tiu, kiu servas por la latina lingvo ("imperfectum, perfectum"), el kiu ni tiris la novan terminon *predikto* ("praedictum" = antaŭdiraĵo).

Modaloj kaj modoj

96

Laŭ la sintaksa funkcio, la verbo aperas en diversaj formoj; tiuj estas la modaloj de la verbo. Modaloj ekzistas tri:

1. la **f i n i t i v o** (latine *verbum finitum*) estas la proprasence verba formo de l' verbo. Ĝi povas funkcii ekskluzive kiel predikato kaj postu-

las por si subjekton.

La finitivo havas tri modojn laŭ la grado de la efektiviĝo de l' ago:

a) la *indikativo* (aŭ *indika modo*) prezentas la agon kiel faktan estantan, estantan aŭ estontan.

b) la *volitivo* (aŭ *ordona modo*, *u-modo*), prezentas la agon, kiel efikantan, t.e. ankoraŭ ne faktan, sed efektivigendan laŭ ekstera volo, deziro, ordono, trudo, eblo.

c) la *kondicionalo* (aŭ *fiktiva modo*, *us-modo*), prezentas la agon kiel nur fiktive imagitan.

Rim. I. Krom tiuj tri ĉefmodoj, oni povus distingi ankaŭ aliajn modojn, kiuj egalrajte meritus tiun nomon; ekz-e, per kiuj oni indikas, ke la subjekto havas la kapablon, devigtecon aŭ intencon plenumi la agon. Tiujn prezent-manierojn la lingvo signas per parolturnoj, konsistantaj el unu el la verboj *povi*, *devi* aŭ *voli* kaj el la infinitivo de la koncerna verbo. Tiujn tri verbojn, uzatajn en tia pozicio, oni nomas "modaj helpverboj", kaj oni efektive vidos poste, ke en tiu uzado ili prezentas apartajn karakterojn (vd. § 116, 181 Rim. 1, 202 Rim. kaj § 305 ĉefine).

2. la *i n f i n i t i v o* estas esence transira formo inter la verbo kaj la substantivo. Al la verbo ĝi similas per tio, ke ĝi povas havi la samajn komplementojn kiel la verbo, sed ĝi malsimilas per tio, ke ĝi ne postulas al si propran subjekton (ĝia subjekto estas aŭ tiu de alia, finitiva verbo, aŭ subkomprenata el la frazenco), kaj ke ĝi posedas unu solan formon, kiu servas do por ĉiuj tempoj kaj modoj (vd. § 117, 1. kaj 2.). Aliflanke ĝi similas al la substantivo per tio, ke ĝi povas plenumi la samajn sintaks-funkciojn (subjekto, objekto, predikativo, adjekto), sed ĝi malsimilas per tio, ke ĝi ne povas esti akompanata de certaj determinantoj (artikolo, adjektivo, prepozicio – krom kelkaj, vd. § 117, 3 kaj 4).

Rim. II. Kiel modalon de verbo oni povas rigardi ankaŭ la verb-substantivon, el kiu oni povas pluformi adjektivon kaj adverbon. Sed ĉar ĝi funkcias kiel pura substantivo, kun ĉiuj ties ecoj, ni pritraktis ĝin inter la substantivoj (vd. ad-substantivoj, § 35 kaj 135-142).

3. la *p a r t i c i p o* estas esence transira formo inter la verbo kaj la adjektivo. Al la verbo ĝi similas per tio, ke ĝi povas havi la samajn tempojn, kaj ke, kvankam ĝi havas nur unu formon por la tri modoj, oni povus facile koncepti kaj jam sporade uzis kondicionalan particon (per *-unta*, *-uta*) kaj oni povas rigardi la pluformaĵon per *-enda* kiel pasivan volitivan particon; sed ĝi malsimilas al ĝi per tio, ke ĝi ne postulas al si propran subjekton. Al la adjektivo, aliflanke, ĝi plene similas laŭ ĉiuj vidpunktoj: oni povas el ĝi formi adverbon per adjekta funkcio kaj substantivon (montrantan la personon, kiu agas), kiu rolas kiel vera substantivo. Vd. tamen § 321.

La originaleco de tiu ĉi sistemo estas, ke ĝi uzas la saman modon por esprimi la efikatajn agojn, jen en ĉefaj, jen en suborditaj propozicioj:

la esp-a volitivo respondas en la eŭropaj lingvoj samtempe al la imperativo kaj al la subjunktivo.

Aliflanke, ĝi posedas 6 participojn, tri aktivajn kaj tri pasivajn, per kiuj ĝi organizas sian tutan kompleksan konjugacion: tiu abundo da participoj donas al la lingvo apartan karakteron, kiu memorigas la helenan morfologion.

Voĉoj

97

Voĉoj ekzistas kvar:

la *aktiva voĉo*, aŭ *aktivo*, estas sistemo, en kiu la verbo esprimas agon aŭ staton plenumatan de la subjekto; ĝi konsistigas, en Esperanto, la plej rektan, plej naturan manieron por esprimi la agadon, kaj estas la bazo de la ceteraj voĉoj.

Oni trovas en Esp-o ankaŭ tri aliajn manierojn prezenti la agadon: aŭ oni povas prezenti ĝin, kiel agon suferatan de la subjekto kaj plenumatan de iu alia – tio estas la *pasiva voĉo*, aŭ *pasivo*; aŭ oni povas prezenti ĝin, kiel trudatan de la subjekto al iu, kiu plenumas ĝin pro ties efiko – tio estas la *faktitiva voĉo* aŭ *faktitivo*; aŭ, fine, oni povas prezenti ĝin kiel reagantan al la subjekto mem – tio estas la *mediala voĉo* aŭ *medialo*.

Tiuj tri voĉoj esprimiĝas diversmaniere: la pasivo uzas kompleksajn formojn, konsistantajn el pasivaj participoj kaj helpverbo; la faktitivo kaj la medialo uzas simplajn formojn kun sufiksoido. Vd. § 99-103 kaj 119.

Aspektoj

98

Aspektojn oni povas distingi kvin:

la *komenca* (inkoativo), per kiu oni prezentas agon konsideratan en ĝia komenco;

la *momenta* (momentaneo), per kiu oni prezentas agon konsideratan kiel sendaŭran, kiel simplan punkton en la tempo;

la *daŭra* (durativo), per kiu oni prezentas agon konsideratan en ĝia malvolviĝo, kiel okupantan larĝan pecon de la tempo;

la *ripeta* (iterativo), per kiu oni prezentas agon kiel plurfoje rekomencigintan kaj ripetitan;

la *fina* (perfektivo), per kiu oni prezentas agon rigardatan kiel perfekte plenumitan.

Ne ĉiu el tiuj aspektoj havas la saman gravecon en la lingvo: sed ĉiuj estas iel aŭ tiel esprimitaj en ĝi (la aspektojn ne esprimeblajn per nia lingvo ni preterlasis). La kategorio de la aspekto estis tute nature enkondukita de Zamenhof en sian lingvon, kaj estus eraro opinii, ke ĝi estas tie pura slavismo. La aspekto estas fundamenta vidpunkto de la homa penso, kaj oni scias, ke ĝi konsistigas la bazon de la konjugacio en ĉiuj semidaj lingvoj (hebrea, araba ktp.); cetera ĝi estas tute ne

fremda al la okcident-eŭropaj, ĉe kiuj la ĉefa diferenco estas, ke la aspekto estas esprimata ne per modifo de la verba radikalo, sed per apartaj tempoj (ekz-e la imperfekto de la romidaj lingvoj) aŭ per kunmetitaj formoj (france: *je suis en train de*; germane: *es wird gebaut* kontraŭ *es ist gebaut*; angle: *he is working, you would meet him* ktp.). Estus alia eraro kredi, ke la kategorio de la aspekto iĝis kaduka kaj malaperas iom post iom en tiuj lingvoj: la uzado de la aspektvalora imperfekto larĝe malvolviĝis en la skriba franca lingvo ĉefe post Flaubert ("Madame Bovary" 1856); oni kalkulis, ke la "progressive form" estas uzata 29 fojojn en la "Aŭtoritata Traduko" de Sankta Marko (1611), dum la moderna angla lingvo nature uzus ĝin en 78 lokoj. La moderna greka lingvo elkonstruis al si konjugacian rimedon por esprimi la aspekton ĉe ĉiu ajn tempo de la verbo. Eĉ ĉe la rusa verbo eminentaj slavologoj, kiel O. Szemerényi, montris, ke la konstanta opozicio inter perfektaj kaj imperfektaj tempoj rezultas de relative freŝa malvolviĝo. Esperanto do, sur tiu aparta kampo kaj malgraŭ la asertoj de nesufiĉe informitaj amatoroj, ĝuste konformiĝas al la evoluo de la "modernaj" lingvoj. Nur ĉe la germana kaj parencaj lingvoj (nederlanda ktp.) la esprimo de la aspekto relative forperdiĝas: tio estas verŝajne la ĉefa kaŭzo, kial la parolantoj de tiuj lingvoj trovas tiom da malfaciloj en la ĝusta uzado de la Esperantaj participoj.

Sed ĝuste ĉar, por ne fortimigi la okcident-eŭropajn lingvanojn, Zamenhof ne volis enmeti en Esperanton morfologian sistemon de la aspekto — oni scias, ke ĝis 1887 enestis unu imperfekto, finiĝanta per *-es*, kiun li rezignis ĵus antaŭ la publikigo de la lingvo — la esprimmaniero de la diversaj aspektoj estas iom neregula kaj la uzado fojfoje ne fiksita. Pritrakton vd. §§ 105-109 kaj 113-114.

LA VOĈOJ, TEMPOJ KAJ MODOJ

Aktiva voĉo

99 Ni esploru unue la aktivon:

LA SIMPLAJ TEMPOJ

Modoj	Tempoj	Formoj
Indikativo	Prezenco Preterito Futuro	<i>kapt as</i> <i>kapt is</i> <i>kapt os</i>
Kondicionalo	Komuna formo	<i>kapt us</i>
Volitivo	Komuna formo	<i>kapt u</i>
Infinitivo	Komuna formo	<i>kapt i</i>
Participo	Preterito Prezenco Futuro	<i>kapt inta</i> <i>kapt anta</i> <i>kapt onta</i>

Rim. I. La volitivo, uzata en la dua persono, ne postulas subjekton: *iru en la straton... Aŭ ne, atendu!* ^z; sed: *ni veturu!* ^z *ĉiu prenu unu balailon! kaj ili ekbalau la tutan straton!* ^z.

Rim. II. En certaj okazoj la aktiva participo akceptas la neŭtradverban finaĵon *-e*. Tiun formon oni nomas **gerundio**: *kapt-ante, kapt-inte, kapt-onte*. Vd. § 183. II.

Rim. III. Ni vidis (§ 96), ke oni sporade renkontas kondicionalan participon: *kaptunta* (kiu kaptus).

Ĉefaj tempoj ekzistas nur ĉe du modoj: indikativo kaj participo; ĉe la tri aliaj modoj oni havas nur po unu simplan tempon (*kapti, kaptu, kaptus*). Tiujn formojn do oni povus rigardi kvazaŭ resumaj por ĉiuj tri tempoj kaj uzi ilin indiferece por prezenco, preterito kaj futuro. Vd. tamen § 111.

Kiel ni jam diris, apud tiuj simplaj formoj ekzistas aliaj, malsimplaj aŭ kompleksaj, kiuj precize indikas la temponuancojn. Oni ricevas ilin per la helpa verbo *esti* kaj la aktivaj participoj. Ĉar estas tri participoj, ni ricevas do tri kompleksajn tempojn respondajn al ĉiu simpla; ĉe la indikativo ni havas naŭ tempojn; kaj ĉe la aliaj modoj, tri.

100

LA KOMPLEKSAJ TEMPOJ

Modoj	Tempoj	R i l a t o j		
		Imperfekta	Perfekta	Predikta
Indikativo	Prezenco	<i>estas</i>	<i>estas</i>	<i>estas</i>
	Preterito	<i>estis</i>	<i>estis</i>	<i>estis</i>
	Futuro	<i>estos</i>	<i>estos</i>	<i>estos</i>
		<i>kaptanta</i>	<i>kaptinta</i>	<i>kaptonta</i>
Kondicionalo	Komuna formo	<i>estus</i>	<i>estus</i>	<i>estus</i>
		<i>kaptanta</i>	<i>kaptinta</i>	<i>kaptonta</i>
Volitivo	Komuna formo	<i>estu</i>	<i>estu</i>	<i>estu</i>
		<i>kaptanta</i>	<i>kaptinta</i>	<i>kaptonta</i>
Infinitivo	Komuna formo	<i>esti</i>	<i>esti</i>	<i>esti</i>
		<i>kaptanta</i>	<i>kaptinta</i>	<i>kaptonta</i>

Oni rimarkos en la supra tabelo, ke la nuancado de la tempoj estas pli delikata ĉe la indikativo ol ĉe la aliaj modoj; ĉe tiuj ĉi pli precizan nuancadon (ekz-e: perfekta preterito kondicionala: *estus estinta kaptinta*) oni ne uzas, ĉar ĝi estas nenecesa kaj tro peza. Cetere ĉiuj ĉi kompleksaj tempoj estas pezaj kaj mallertigas la frazon. Tial oni malofte uzas ilin, krom la kelkfoje postulatajn preteriton kaj futuron perfektajn.

Por eventuala nuancado de la tempoj, oni prefere uzas la adverbojn *ĵus* (proksimume respondan al la perfektaj tempoj) kaj *tuj* (proksimume al la prediktaj tempoj), kiuj proprasence esprimas pliproksimecon en la estinteco kaj en la estonteco. Sed tiu fakto apartenas pli al la sintakso ol al la morfologio. (Kp. § 246-248).

101

La solaj vere pasivaj formoj estas la 3 participaj sufiksoj, kiuj prezentas, kun la aktivaj finaĵoj de l' indikativo kaj participo rimarkindan forman simetrian:

Tempoj	Aktivo		Pasivo
	Indikativo	Participo	Participo
Prezenco	-as	-anta	-ata
Preterito	-is	-inta	-ita
Futuro	-os	-onta	-ota

Kiel oni vidas, la vokalo A ekzistas en ĉiuj prezencaj formoj, I en la preteritaj kaj O en la futuraj.

Ĉiuj aliaj modoj estas formataj helpe de tiuj tri participoj kaj de la verbo *esti*, kiu perdas, en tiu okazo, sian propran signifon de ekzisto kaj esprimas simple la preparolatan staton (vd. § 110).

Rim. I. En la diverslingvaj eldonoj de la "Unua Libro", Z. formulis la regulon pri pasivo jene: "Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo *esti* kaj de la participo pasiva prezenca de la bezonata verbo". Sed jam en 1890 (en la n.º 41) li forigis la vorton "prezenca". T. Jung apogis sin sur tiu primitiva teksto, por provi pravigi ne-zamenhofan sistemon de pasivo. Se li estus atente leginta la "Unuan Libron", li estus rimarkinta, ke en la ekzemplaj tekstoj troviĝas 4 pasivaj formoj, 2 per *-ata*, sed 2 aliaj per *-ita*. La klarigon ŝajne malkovris samtempe kaj aparte R. Schwartz kaj E. Sonnenfeld: en tiu tempo Z. rigardis kiel pasivan konjugacion nur tiun rimedon esprimi la agon, kia estas la sufikso *-at*, kaj ĉe kiu la verbo *esti* akiras la funkcion de helpverbo pasiva; la sufiksojn *-it* kaj *-ot* li rigardis kiel adjektivajn predikativojn de la ordinara kopulo *esti*.

Pri la formo de la pasivaj tempoj kaj modoj rigardu la tabelon sekvan.

LA PASIVO

Moj	Tempoj	R i l a t o j		
		Imperfekta	Perfekta	Predikta
Indikativo	Prezenco	<i>estas</i>	<i>estas</i>	<i>estas</i>
	Preterito	<i>estis</i>	<i>estis</i>	<i>estis</i>
	Futuro	<i>estos</i>	<i>estos</i>	<i>estos</i>
		<i>kaptata</i>	<i>kaptita</i>	<i>kaptota</i>
Kondicionalo	Komuna formo	<i>estus</i>	<i>estus</i>	<i>estus</i>
		<i>kaptata</i>	<i>kaptita</i>	<i>kaptota</i>
Volitivo	Komuna formo	<i>estu</i>	<i>estu</i>	<i>estu</i>
		<i>kaptata</i>	<i>kaptita</i>	<i>kaptota</i>
Infinitivo	Komuna formo	<i>esti</i>	<i>esti</i>	<i>esti</i>
		<i>kaptata</i>	<i>kaptita</i>	<i>kaptota</i>
Participo	Komuna formo	<i>kaptata</i>	<i>kaptita</i>	<i>kaptota</i>

Tia plena tabelo tamen estas farebla nur ĉe la t.n. rezultverboj, kiuj estigas post si staton (vd. § 110). Ĉe la verboj senrezultaj, ĉe kiuj la stato finiĝas kune kun la ago (*ami, memori, havi, ktp.*), kompreneble mankas la perfektaj tempoj, ĉar la finiĝo de la ago signifas la ĉeson de la stato: *mi estas amita = mi ĉesis esti amata = mi ne estas amata*. Ĉe tiaj verboj do la dua kolono de la tabelo estas malplena.

Rim. II. Kiel oni vidas tie, la participo povas esprimi jen tempon, jen rilaton, ĉar fakte ĝi rilatas ĉiam al la tempo de la ĉefprop-a predikato. En kelkaj okazoj la pasiva participo akceptas la neŭtr-adverban finaĵon *-e*. Vd. § 183.

Rim. III. Kiel ni vidis (§ 96), oni sporade renkontas pasivan kondicionalan participon: *kaptuta* (kiu estus kaptata), kaj aliflanke, la oficialigita sufiksoido *end* (*kaptenda*) estas vere pasiva volitiva participo.

Komparante la ĉi-supran tabelon kun tiuj de la aktivo, oni rimarkos la grandan diferencon, kiu kuŝas inter tiuj du voĉoj: ĉe la aktiva la uzo de simplaj formoj estas la regulo, kaj tiu de kompleksaj formoj la escepto; male, ĉe la pasivo ekzistas nur kompleksaj formoj, oni do estas ĉiam devigata precizigi la temponuancon kaj ĉiufoje elekti inter la tri participoj: tio kaŭzas nediskuteblan ĝenon kaj oftajn erarojn. Krome, tiu manko de simplaj formoj igas la Esp-an pasivon peza kaj maloportuna.

El tio rezultis provoj eviti tiujn malavantaĝojn. Iuj, precipe la poetoj, provis malpezigi la fundamentajn formojn. Konsiderante, ke la verbo *esti* ne havas tie sian plenan signifon (Kp. § 101), ili konkludis, ke por tiu simpla rolo de kopulo la verbaj finaĵoj sufiĉas; tiel klariĝas frazoj kiel:

Malĉjek, simplul' malriĉa, is plej estimata.

(Grabowski, Pan Tadeuŝ, VI. 543)

— la sama poeto uzis tiun finaĵon eĉ anstataŭ *esti* ekster ĝia kopula funkcio:

li anstataŭas mastron: se mastro as fore...

(*ibid.* I. 152). —

De tio naskiĝas nature la uzo de tiuj verbaj finaĵoj kunmetitaj kun la participaj sufiksoj:

Laŭdatu Jezu-Kristo!

(*ibid.* VI. 604)

Tia kunmetado estis tiel konforma al la konstruo de la lingvo, ke ĝi estis plurfoje kaj plurorigine proponita. Tamen ĝi neniam prosperis en la komuna lingvo, pro la malfacilo de uzado kaj komprenado, kiun kaŭzas la ekzisto de triobla participa sufikso, kaj la duobla signifo de ĉiu el tiuj sufiksoj, ĉar ili montras kune la pasivecon kaj la tempecon. Nur unika sufikso, montranta sole la pasivecon, estus povinta enradikiĝi.

Tial plejparte la aŭtoroj uzas alian vojon kaj anstataŭ la pasivo metas ofte medialon, kvankam tiu ĉi, verdire, ne havas precize la saman signifon (vd. § 104).

Rim. I. Oni ne devas konfuzi la ĉi-supran uzon de *as* en la rolo de *estas* kun alia, ekstere simila, sed de malsama valoro, t.e. la uzo de tiuj finaĵoj por eviti la ripeton de la verbradiko: *mi furas, ke vin mi ne perfidis, nek -as, nek -os!* Tia dirmaniero estas tute konforma al la spirito de la lingvo, kaj troviĝas eĉ fojfoje en la konversacio.

Rim. II. La ĉefa diferenco inter aktivo kaj pasivo (aŭ medialo) estas, ke la subjekto ĉe la aktivo estas la aganto, dum ĉe la pasivo (kaj medialo) la priagato. Tial, ĉe la aktivo oni devas esprimi la aganton, dum ĉe la pasivo (kaj medialo) tio ne estas necesa: oni povas diri: *la tasko estas finita* aŭ *la vitro rompiĝis*, ne precizigante, kiu finis aŭ rompis. El tio sekvas, ke ĉe la pasivo la atento estas altirata pli sur la agadon ol sur la aganton (kiu povas esti neesprimita). Tio havas influon al la uzado de la pasivo kaj de la pasivaj participoj.

Faktivita voĉo

103 La faktitiva voĉo esprimiĝas dumaniere: per sinteza formo kaj per la memstara *igi*.

A. La *sintezita formo* de la faktitiva voĉo estas farata per la sufiksó *ig* adaptata al la verbradiko kaj sekvata de la aliaj finaĵoj:

Modoj	Tempoj	Formoj
Indikativo	Prezenco Preterito Futuro	<i>kaptigas</i> <i>kaptigis</i> <i>kaptigos</i>
Kondicionalo	Komuna formo	<i>kaptigus</i>
Volitivo	Komuna formo	<i>kaptigu</i>
Infinitivo	Komuna formo	<i>kaptigi</i>
Participo	Prezenco Preterito Futuro	<i>kaptiganta</i> <i>kaptiginta</i> <i>kaptigonta</i>

Krom la ĉi-supraj simplaj formoj, kompreneble, ekzistas ankaŭ la samaj kompleksaj formoj, kiujn ni vidis ĉe la aktivo (§ 100).

La faktitivaj formoj estas esence aktivaj, kaj ĉiam transitivaj. Pro tio ili povas havi ankaŭ pasivan esprimon: ekzistas do ankaŭ *faktivitiv-pasivo*. Ekzemple *kaptig* povas esti konjugata pasive per la samaj kompleksaj formoj kiel *kapt* (kp. la tabelon sub § 101).

B. La *analiza formo* de la faktitivo esprimiĝas per la memstara *igi*, konjugata same kiel la aliaj aktivaj verboj (vd. § 99) kaj sekvata de la verbradiko en infinitivo: *igas kapti, igus kapti, igi kapti, iganta kapti* ktp.

Teorie estas eblaj ankaŭ la kompleksaj formoj (*esti iginta kapti*) kaj eĉ la pasivaj (*esti igita kapti*), sed ili, pro sia pezeco, ne estas uzataj.

Cetere, pri la uzado de la faktitivo vd. § 119 C.

Mediala voĉo

La mediala voĉo esprimiĝas per la sufiksoido **iĝ** adaptata al la radiko kaj sekvata de la aliaj finaĵoj.

104

Modoj	Tempoj	Formoj
Indikativo	Prezenco Preterito Futuro	<i>kaptiĝas</i> <i>kaptiĝis</i> <i>kaptiĝos</i>
Kondicionalo	Komuna formo	<i>kaptiĝus</i>
Volitivo	Komuna formo	<i>kaptiĝu</i>
Infinitivo	Komuna formo	<i>kaptiĝi</i>
Participo	Prezenco Preterito Futuro	<i>kaptiĝanta</i> <i>kaptiĝinta</i> <i>kaptiĝonta</i>

Ĉi tiu esprimrimedo estas speciale interesa pro tio, ke en ĝi la signifo de la sufiksoido **iĝ** profunde modifiĝis, tiel ke oni apenaŭ rekonas plu la originan senco.

Fakte, laŭ sia senco (*ekesti ia*), **iĝ** esprimas la komencan aspekton, kaj, ĉar ĉe la transitivaj verboj ĝi atribuas pasivan senco, ĝi devus egalvalori kiel **ek + at**: *ruliĝi*: *komenci (ek) esti rulata: esti ekrulata*. Tamen, la lingvouzo, manke de alia mediala sufikso, aplikas **iĝ** en simple refleksiveca senco, t.e. perdigis al ĝi la signifon originan **ek**, konservante sole la signifon akcesoran **at**.

Tion klare montras la verbotempo de la respondaj formoj. Se **iĝ** enhavus la signifon **ek**, oni devus diri pri ekrulita kaj moviĝanta ŝtono: *la ŝtono ruliĝis = iĝis* (komencis esti) *rulata*; sed oni ja diras: *la ŝtono ruliĝas = estas rulata*. Kaj eĉ, por signi la komencan aspekton oni aldonas **ek**: *la ŝtono ekruliĝis*, ĉar *ruliĝis* akiris la aspekton de daŭra ago en la paseo.

Rim. I. Ĉe la netransitivaj verboj, kie ne ekzistas pasiviga efiko de **iĝi**, ĉi tiu, kompreneble, konservis sian originan signifon: *sidiĝi*, *stariĝi*.

Rim. II. Ĉar la mediala voĉo havas en si pasivecan karakteron, estus pleonasme kaj eĉ absurde uzi ĉi tie la pasivajn finaĵojn: do formoj kiel *kaptiĝata*, *naskiĝita* ktp. estas simplaj barbarismoj.

Cetere, pri la uzado de la mediala voĉo vd. § 119 D.

LA ASPEKTOJ

El la kvin supre (§ 98) difinitaj aspektoj, ne ĉiu havas regulan esprimilon nek saman disvolviĝon: la plej ofte uzata estas la komenc-aspekto, kaj ties kaŭzo estas, ke tiu aspekto estas komuna je la slavaj kaj je la latinidaj lingvoj, kiuj ankaŭ povas ĝin esprimi, kvankam fragmente, tamen per speciala sufikso.

105

La komenca aspekto estas montrata dumaniere:

1. Ĝenerale per la prefiksoido ek: *eksonis la sonoriloj^Z; ekbruligu kandelon^Z; ekdormi, ekkapti, ekvidi, ekkoni, ekscii*. Pluajn ekzemplojn vd. § 358.

2. Kelkfoje per la sufiksoido iĝi: *sidiĝi^Z; stariĝi^Z; indigniĝi, kuŝiĝi^Z, boliĝi^Z, estiĝi^Z, putriĝi^Z, pendigi^Z, koleriĝi^Z*; komenc-aspektan signifon havas ankaŭ la iĝ-verboj devenintaj el substantivaj kaj adjektivaj radikoj: *regiĝi, verdiĝi* (vd. § 358 1 kaj 2). Sed, kiel ni vidis, ĉe transitivaj verboj iĝi servas por montri la medialan voĉon, do ĉe ili ĝi ne estas uz-ebla en komenc-aspekta funkcio: *ruliĝi* ne signifas *ekruli*, sed proksimume: *esti rulata* (vd. § 119 D).

Tamen, ekzistas kelkaj tre malmultaj esceptoj: *sciĝi* (en la senco: *ekscii*); tial oni evitas diri: *la afero sciĝis*, sed oni prefere diras: *oni sciĝis pri la afero*, aŭ *la afero iĝis sciata*. Same: *decidiĝi* (ekdecidi), *komunikiĝi kun* (ekkomuniki).

Rim. I. Aparta okazo estas la verbo *koni*. En la propra senco, la medialo estas *koniĝi*: *koniĝas majstro laŭ sia laboro^Z*, kaj la komenc-aspekta formo estas *ekkoni*: *valoron de objekto oni ekkonas post difekto^Z*. Sed en la senco "fariĝi reciproke konata, interligi societajn rilatojn", oni uzas nur la participfinan formon *konatiĝi*, kaj la suplementon enkondukas la prepozicio *kun*: *ili konatiĝis jam hieraŭ; li konatiĝis kun sia estonta edzino en Brno; kongresa konatiĝa vespero*. Tiun konstruon oni uzas ankaŭ metafore: *ĉi-matene mi konatiĝis kun la urbo* (kvazaŭ la urbo estus vera persono).

Rim. II. Anstataŭ la komenc-aspekta iĝ oni povas uzi faktitivon kun refleksivo, por akcenti la volecon de la ago *decidiĝi sin; sidiĝi sin, stariĝi sin*. La du lastaj formoj estis proponitaj anstataŭ la iĝ-formo, sed tiu propono, pro la trolongeco de la formoj, kaj pro tio, ke ĉe tiuj agoj oni ne sentas la neceson de troa emfazo pri la voleco, apenaŭ trovis akceptantojn. Estus cetere senutile ekstermi el la lingvo formojn tiel tradiciajn. Oni povus diri anstataŭ *sidiĝu, stariĝu* ankaŭ simple *sidu, staru*, sed per tio oni esprimus plie ordonon ol proponon.

Rim. III. Inter la iĝ-formo kaj ek-formo ekzistas nur nuanca diferenco. La iĝ-formo montras la statŝanĝon laŭ ties daŭro, do tiun agon, kiu rezultigas la novan staton (*mi sidiĝas*: mi faras movon, kies rezulto estas la sido). La ek-formo montras la momenton, la tempopunkton, en kiu la nova stato komenciĝas (*mi eksidas*: mi komencas sidi). Tial oni ne uzas ĝenerale *eksidi* anstataŭ *sidiĝi*, oni ja volas tiri la atenton ne al tio, ke oni komencas la sidadon, sed al tio, ke oni moviĝas por sidi.

Rim. IV. Kiel ni vidis (§ 104), el la mediala iĝ-formo tute perdiĝis la komenc-aspekta senco, kaj tial oni esprimas ĝin per ek: *ekruliĝi, ekinteresiĝi, ekmoviĝi, ekŝanceliĝi^Z*.

Rim. V. Ĉe verboj de momenta ago la komenc-aspekta formo estas superflua. Tamen, oni trovas kelkfoje ek: *ekhalti*, por akcenti la momentecon, subitecon (momentaspekta formo). Ĉe Z. oni trovas ankaŭ iĝi: *ĉesiĝi, mortiĝi*. Sed ili estas tute superfluaĵ, eĉ kontraŭsencaj en tiu signifo, en kiu Z. uzas ilin. Oni povus pravigi tiujn formojn en la okazoj, kiam oni volas esprimi la statŝanĝon laŭ ties daŭro: *la pluvo ĉesiĝas* (iom post iom ĉesas); *li mortiĝas* (estas mortanta). Sed

ĉi tiuj sencoj ne estas sufiĉe evidente esprimataj tiamaniere, do oni uzu prefere la parentezajn formojn.

Momenta aspekto

La **m o m e n t a a s p e k t o** estas esprimata per la prefiksoido **ek-**, kiu tiel havas du signifojn. Sed praktike, tio ne gravas, ĉar la uzo de **ek-** por esprimi la momentecon, sufiĉe ofta ĉe la komenco de la lingvo, preskaŭ malaperis. Ĝenerale tia momenteco estas komprenigata de la kunteksto, kaj **ek-** servas nur por akcenti la abruptan komenciĝon.

Ekz-e en "*ekbrilis fulmoj*", la momentecon komprenigas pli la ideo pri fulmo ol la prefikso **ek-**, kiu tute ne signas momentecon en "*ekbrilis la suno*".

La momenta aspekto estas la plej kaduka el la aspektoj, ĉar nenio respondas al ĝi en la okcident-eŭropaj lingvoj.

106

Daŭra aspekto

Oni povas esprimi helpe de la **d a ŭ r a a s p e k t o**, ke la koncerna ago okupas sufiĉe grandan pecon da tempo, ne distingante, ĉu temas pri efektive unika daŭre malvolviĝanta ago, aŭ pri aro da ripetataj similaj agoj, kiujn oni ne rigardas apartaj, sed kvazaŭ konsistigantaj unu tutajon. Ĝi estas esprimata per la sufikso **ad**: *tie ŝi sidadis kaj rigardadis la junan reĝidon*^Z (= unu daŭra ago); *lia koreto batadis*^Z (unu ago konsistanta el multaj eroj); *li almoze elpetadis al si panon*^Z (= pluraj ripetitaj agoj, sed konsistigantaj unu solan sintenadon); *la prediklibron vi ofte jetadis al mi sur la kapon*^Z (same).

Rim. En kelkaj okazoj, kiam la frazo aludas neniun alian kunrilatitan agon, la daŭra aspekto povas esti esprimata per la imperfektaj tempoj: *estis finiĝanta la tago*^Z.

La daŭra aspekto povas kombiniĝi kun la komenca: oni povas deziri montri, ke la longdaŭra ago konsistas el plurfoje, ripete komencitaj agoj: *ofte ŝi ekmemoradis, kiel kore ŝi lin kisis*^Z; *de tago al tago la reĝido ŝin ĉiam pli ekamadis*^Z; sed ĉe momentaj agoj **ek** ne estas uzata, ĉar superflua: *li perdadis sian monon* (ne: *ekperdadis*).

En la unuaj tempoj de Esp-o, sub la influo de la slavaj lingvoj, la daŭr-aspekto estis tre uzata; nun oni uzas ĝin malpli ofte, nur en okazo de nepra bezono (ne uzu do ĝin, malgraŭ la supraj Z-aj ekzemploj, kiam la ripeto estas jam esprimata per adverbo: *ofte, plurfoje, ĉiam, multe, de tago al tago, iom post iom, pli kaj pli* ktp.); sed ĝi ne rustiĝis, ĉar, kvankam slav-origina, ĝi ne estis fremda al la aliaj lingvoj.

107

Ripeta aspekto

Oni esprimas helpe de la **r i p e t a a s p e k t o**, ke la koncerna ago estis farita unu fojon plie. Ĝi estas esprimata per la prefikso **re**: *relegi poemon; refari malbonan taskon; rediri la lecionon*.

108

Rim. Kiel oni vidas per la ekzemploj (kp. ankaŭ: *reverki tradukon*), tiu signifo de re ofte miksiĝas kun alia, per kiu oni esprimas inversan agon: *redoni libron al pruntinto*.

Kiam oni volas esprimi plurfojan ripeton, oni devas uzi aŭ adverbojn (ĉiam, ofte, plurfoje, plure, ripete): *ĉiam rediri la saman litanion; plurfoje rakonti historion...* aŭ ripeti la prefikson **re**: *re kaj rediri, re kaj reveni* ktp. (Eĉ kun aliaj prefiksoj oni povas atingi la saman efekton: *fulmoj ek kaj ekbrilis*.)

Fina aspekto

109

La fina aspekto sendube estas eble almenaŭ tiel bezonata, kiel la antaŭaj; tamen, en Esp-o ĝi ne havas apartan esprimilon.

La fin-aspekton oni povas nur escepte esprimi per perfektaj tempoj (*la domo estas konstruita*), ĉar tiuj konjugaciaj formoj montras ĉiam finitecon relative al iu tempopunkto, dum la fin-aspekto servas por montri finitecon en si mem, sen rilato kun ia ajn dato aŭ alia ago.

Tial oni provis diversajn rimedojn por esprimi tiun aspekton. La plej malnova kaj uzata estas la utiligo de la prepozicio **el** kiel prefikso: oni kromatribuis al ĝi, laŭ imito de la germana kaj latina lingvoj, la signifon de ĝisfina plenumado de ago: *ni vane elportis tiujn terurajn oferojn^Z; mi ellaboris projekton de korporacia organizo^Z; eluzitajn ŝuojn^Z; eltrinki glason per unu tiro^Z*.

Sed **el** ne povas esti ĉiam uzata, ĉar la konfuziĝo de ĝiaj sencoj propra kaj fin-aspekta povas estigi malklarecon en kelkaj okazoj: *elskribi, elmeti, elsarĝi, elpreni, eldoni* ekz-e ne estas uzablaj en la senco: *komplete skribi, meti, ŝarĝi, preni, doni*.

Tial oni utiligis ankaŭ aliajn prefiksoidojn kun fin-aspekta signifo. Tiaj estas:

Tra: *lernolibron oni ne devas tralegi, sed tralerni^Z; tralabori libron; tradraŝi iun^Z; tramanĝi bankedon; trafrostiĝi*.

Rim. I. **Tra** signifas: de unu ekstremo al alia. Do ĝi markas ne la simplan fin-aspekton, sed tion, ke ia ago concernas ion laŭ ties tuta amplekso. El tio sekvas, ke tiu io devas ekzisti jam antaŭ la ago. *Traskribi* oni povas *folion*, sed ne *leteron*, ĉar ĉi lasta kreiĝas nur per la skribado. *Tralabori* oni povas nur ion jam antaŭe faritan, *traverki* nur ion jam antaŭ verkitan. La fin-aspekta signifo de **tra** do estas modifita per flanksenco kaj tiu ĉi flanksenco malhelpas, ke **tra** estu uzata kiel ĝenerala fin-aspekta esprimito.

Sat: *satmanĝi, sattrinki, satrigardi, sataŭskulti, satbaniĝi, satludi*.

Rim. II. **Sat** estas ankoraŭ pli strikte uzbla ol **tra**. Ĝi havas la flanksencon de *subjektiva* (tro)sufiĉeco. Oni do ne povas diri *satkonstrui domon* kun la signifo "komplete konstrui".

Fin: *finkanti, finlabori, finverki, finaŭskulti, finlegi, finmanĝi, finkonstrui* ktp.

Rim. III. **Fin** estas ne malofte renkontebla, precipe lastatempe (ĉe Z. nur du ekzemploj). Tamen, ĝi ne estas plaĉa: *fin* estas substantiva radiko, iel tro peza por

esti verba prefikso de aspekto; ĝi igas la verbon ŝajni pli kunmetaĵo ol verboformo. Krome, ĝia senco ne respondas al la dezirata, kiu ja estus *ĝisfin*. Eble tio estas la kaŭzo, ke tamen ĝi ne povas definitive venki.

Tut: *tutaĉeti, tutlegi, tutlerni*.

Rim. IV. **Tut** estas ankoraŭ pli malplaĉa ol **fin**: ĝi estas kunmetaĵo, ne verbformo; kaj krome kunmetaĵo nekutima, al kiu oni devas preferi la simplan analizan formon: *tute aĉeti, legi, lerni*. (Kp. § 286. Rim. II).

Tiu abundo de prefiksoj por la sama signifo pravas, ke la demando ne estas solvita. Vere, oni povas bedaŭri, ke ne ekzistas en Esp-o prefiksoido speciale fin-aspekta.

Fakte, la fina aspekto estus tre bonvena en lingvo, kiu ne havas simplan verboformon por la imperfekto, ĉar ĝi anstataŭus la perfektan tempon kaj tiel la simpla preterito estus rezervebla por la imperfekto. Tio okazis en la hungara lingvo, kie, pro la ekzisto de fina aspekto, la imperfekta formo iĝis superflua, arkaikigis kaj malaperis el la ordinara uzado. Se tamen tia esprimilo de fina aspekto (ekz-c *par*) neniam estis eĉ proponita, tion klarigas unue, ke ĉe la verboj sen daŭro la komenca aspekto koincidas kun la fina, do ĉi lasta ne bezonas esti aparte esprimita; due, ke preskaŭ ĉiuj prefiksoj donas al la verbo aspekton finan (vd. § 365. Rim. II). Per tio, la okazoj, en kiuj oni devas esprimi la finan aspekton per speciala fin-aspekta distingilo, konsiderinde malpliĝas.

Rim. V. En la antaŭaj eldonoj Kalocsay proponis kiel solvon la uzon de la prefiksoido **per-**; sed en la posta "Vojaĝo inter la tempoj", li rezignis tiun proponon favore al la prefiksa uzo de la prepozicio **ĝis-**. Nek la unua, nek la dua propono ricevis multe da aproboj. Kaj post la rimarkinda pledo de T. Nakamura (en Oomoto, Okt. 1968), mi sentas malpli da malinklino al la prefiksa uzo de **fin-** por tiu senco. (GW).

Rim. VI. Alia ideo estas tiu de ago, kiu finiĝas, ĉesas, sen konsidero de tio, ĉu ĝi estas perfekte plenumita aŭ ne (*ĉesa aspekto*). Tion oni esprimu per ĉesi: *ĉesoni, ĉesi skribi*.

UZADO DE LA TEMPOJ

Tempoj simplaj kaj kompleksaj

1. Indikativo

Ni vidis (§ 95), ke la tempoj de l' *indikativo* havas, ĉe la aktivo kiel ĉe la pasivo, duoblan funkcion:

1. ili esprimas, en kia peco de la tempo lokiĝas la ago, t.e. ĉu rilate al la momento, en kiu oni parolas, la ago estas pasinta, nuna aŭ okazonta. Tiun signifon esprimas ĉe la aktivo la simplaj formoj, ĉe la pasivo la formoj de la helpverbo.

2. ili esprimas, kian momenton de sia plenumiĝo atingis la ago rilate al fiksita momento, t.e. ĉu ĝi estas finita (perfekto), aŭ ankoraŭ nefinita (imperfekto) aŭ nur komenciĝonta (predikto) rilate al ia tempopunkto kaj ĝenerale rilate al alia ago. Tiun signifon esprimas ĉe la aktivo la kompleksaj formoj, ĉe la pasivo la participaj formoj.

110

Rim. I. Oni devas ne konfuzi tiujn rilatajn tempojn kun la aspektoj: ankaŭ tiuj ĉi povas esprimi la komenciĝon aŭ plenumitecon de ago, sed konsideratan en si mem, sen ia ajn rilato al tempopunkto aŭ al alia ago. Tiun diferencon oni komprenos laŭ la ekzemploj: *la tuta sekvantaro rigardadis, sed nenion pli rimarkis ol ĉiuj aliaj*² (daŭra aspekto); *li estis rigardanta en la libron, kiam mi eniris* (imperfekta preterito); *lernolibron oni devas tralerni*² (fina aspekto); *kiam vi estos lerninta la libron, mi pridemandos vin* (perfekta futuro); *li eltrinkis la botelon* (fina aspekto); *kiam li estis trinkinta la botelon, li mendis alian* (perfekta preterito).

Sed la funkcion de la kompleksaj tempoj ni devas pli funde analizi; efektive ĝi ne konsistas nur en la signado de antaŭ-, sam- aŭ posttempo-rilate al alia ago: interne de ili mem oni povas distingi la rilaton inter iliaj du elementoj: la verbo *esti* kaj la participo. La participoj esprimas agon, kiu estigas staton; la verbo *esti* montras la tempon de tiu stato. La tempo de la participoj montras, ĉu la esprimita ago estas antaŭa, samtempa aŭ posta rilate al la estigita stato.

Ekzemploj:

P e r f e k t o : *li estis, estas, estos reveninta*: ekzistis, ekzistas, ekzistos *stato* estigita de la *antaŭa* ago *reveni*. Tiu ago do jam finiĝis, kiam la stato komenciĝis; la stato estas la *rezulto* de la perfekte plenumita ago.

I m p e r f e k t o : *li estis, estas, estos revenanta*: ekzistis, ekzistas, ekzistos *stato* estigita de la *duma* ago *reveni*. Tiu ago do daŭras samtempe kun la stato; la stato estas mem la *daŭro* de la ago.

P r e d i k t o : *li estis, estas, estos revenonta*: ekzistis, ekzistas, ekzistos *stato* estigita de la *posta* ago *reveni*. Tiu ago do nur sekvas la staton; la stato estas estigita per tio, ke la ago sekvas; la stato do estas la *antaŭageco*, aŭ la *intenco* de ago.

La perfektaj tempoj do esprimas ne simplan antaŭtempecon, sed rezulton.

La imperfektaj tempoj esprimas ago-daŭron.

La prediktaj tempoj esprimas ne simplan posttempecon, sed tiun staton, kiun la sekvonta ago estigas antaŭ si.

Se la perfektaj tempoj esprimus nur simplan antaŭtempecon, la du frazoj: *la domo estis konstruata* kaj *la domo estas konstruita* estus sam signifaj. Estus ja egale, ĉu la pasintecon oni esprimas per *esti* kaj per participo samtempa al tiu *estis* (-ata), aŭ per *estas* kaj per participo antaŭtempa al tiu *estas* (-ita). Sed la supraj du frazoj havas tre klare distingeblan diferencon inter si. La perfekta formo (*estas -ita*) signas *rezulton*, ĝi diras, ke, en la nuntempo, la domo estas *preta*. La imperfekta formo (*estis -ata*) signas agodaŭron; ĝi diras, ke en pasinta tempo okazis konstruado. Tial oni diras: *tiu domo estis tre longe konstruata* (ĉar temas ĝuste pri la *daŭro* de la konstruado), sed: *fine la domo estas konstruita* (ĉar oni emfazas la *pretecon* de la domo).

La perfektaj tempoj do esprimas *aktualan rezulton*; tio ke la ago, kiu

estigis la rezulton, estas antaŭtempa rilate al tiu rezultstato, estas afero memkomprenebla sed flanka. Tiel povas okazi, ke en sinsekvaj propozicioj la *perfekta* tempo kelkfoje esprimas ĝuste *posttempecon* rilate al ago esprimita per imperfekta tempo: *la mono estis longe kolektata, sed fine ĝi tamen estis kolektita*²; tie ĉi la kolektiteco estas posttempa al la kolektado kaj tamen ĝi estas esprimita per *estis -ita*, ĉar ja temas pri rezulto, kaj tio estas la sola valida konsidero, ne la antaŭ- aŭ posttempeco. Kp. ankaŭ: *dum en unu ĉambro la gastoj dancadis, en la dua ĉambro estis preparata la vespermanĝo; kiam la tablo estis preparita, oni invitis la gastojn al la tablo*².

Same: la predikta prezenco: *mi estas skribonta leteron* kaj la imperfekta futuro: *mi estos skribanta* — ne estas samsignifaj. La lasta esprimas daŭran agon en la futuro kaj estas preskaŭ samsignifa kun: *mi skribos*. Sed la unua esprimas staton antaŭ skribo de letero: tiu stato tie ĉi estas la *intenco* de leterskribo. Aŭ: *li estas falonta* ne signifas simple: *li falos*, sed ke li estas en stato, el kiu nature sekvas la falo (li jam perdis la ekvilibron). Se oni volas esprimi la futuran plenumiĝintan falon per kompleksa tempo, oni devas diri *li estos falinta*, kun la perfekta formo. *Li estos falanta* esprimus daŭran agon venontan, do tiun staton, dum li falas.

La ĵus pritraktitaj signifoj de la kompleksaj tempoj estigas kelkajn komplikajojn. Tio ne rilatas al la tempoj prediktaj (-onta, -ota), kie la senco de la intenco aŭ antaŭaga stato estas tute klara, ne konfuzebila. Sed pri la perfektaj kaj imperfektaj tempoj oni devas pli detale okupiĝi.

1. La plejparto de la verboj (desegni, skribi, konstrui, legi ktp.) signas agon, kiu havas daŭron kaj kiu post sia finiteco postlasas pli-malpli percepteblan rezulton. Ilin do oni povas nomi **v e r b o j d e d a ŭ r o k a j r e z u l t o**. Ce ili validas la supre diritaj konsideroj: la rezulton oni esprimas per perfekta tempo (kun *-inta* aŭ *-ita*), la daŭron per imperfekta tempo (kun *-anta* aŭ *-ata*). Do: *la suno estas leviĝinta* — oni akcentas la staton estigitan per la leviĝo; *la suno estis leviĝanta* — oni akcentas la leviĝon mem, ties daŭron.

2. Sed ekzistas verboj, kiuj esprimas agon esence nur daŭran, sen posta rezulto. Ekzemple: *koni* estas ago daŭra, kaj post ĝia finiteco nenio postrestas. Tiaj verboj estas ekz-e: abomeni, admiri, adori, akompani, ami, amuzi, aspiri, atendi, atenti, balanci, bedaŭri, bezoni, deziri, (pri)dubi, envii, esperi, estimi, favori, festi, flari, fidi (ne: konfidi), frekventi, funebri, gardi, glori, gvidi, ĝui, havi, helpi, honori, ignori, interesi, karesi, kompati, koni, koncerni, konsideri, konscii, kredi, kuraci (ne: sanigi), laŭdi, logi (ne: delogi), luli, memori, miri, moki, observi, opinii, peli (ne: forpeli), persekuti, priplori, posedi, postuli, praktiki, preferi, protekti, regi, regali, respekti, revii, rigardi, saluti, scii, sekvi, senti, serĉi, sieĝi, sopiri, speguli, suferi, suspekti, ŝanceli, ŝati, ŝuldi, taksi, teni, elteni, enteni, deteni (ne: reteni), tenti, timi, toleri, trakti (ne: pritrakti), treni, varti, vidi, viziti, voli. Oni povas ilin nomi **v e r b o j d e**

daŭro sen rezulto. Nu, ĉar tiuj agoj postlasas nenian rezulton, ĉe la respektivaj verboj oni neniam uzas la rezult-sencajn *perfektajn* formojn (kun -inta, -ita), sed ĉiam nur la daŭr-sencajn *imperfektajn* (kun -anta, -ata); *li estis vivanta, konata, amata* (ne: li estas vivinta, konita, amita). Eĉ por esprimi antaŭtempecon oni uzas la imperfektajn formojn, kaj la antaŭtempecon oni signas per klarigaj adjektoj (antaŭe, jam antaŭe, pli frue ktp.) aŭ alimaniere oni turnas la frazon: *li ne estis plu amata de ŝi* (ne: li estis amita); *tiam oni jam ĉesis lin envii* (ne: oni estis lin enviinta). La afero ne estas la sama, kiam la participo staras sola (vd. § 118, 2): oni do povas diri: *li sentis ankoraŭ nesentitan animskuon*.

3. Ekzistas verboj esprimantaj agon, kies plenumiĝo mem estas preskaŭ neperceptebla, kaj kiu estas konstatebla preskaŭ nur aposteriore, per sia rezulto. Ekzemple, se oni perdas ion, la agon *perdi* mem oni konstatas nur poste, per la rezulto (manko); se oni forgesas ion, oni konscias pri la ago *forgesi* nur poste, per nememorado; se oni atingas ion, la ago *atingi* efektiviĝas nur en la momento, kiam oni konstatas la atingitecon, kaj en tiu momento la ago mem jam ĉesis. Tiujn verbojn oni povas nomi **v e r b o j d e r e z u l t o s e n d a ŭ r o**. Tiaj estas ekz-e: akiri, amnestii, aresti, asekuri, asigni, atenci, atingi, decidi, difekti, difini, distingii, doni, donaci, dungi, fendi, fermi, malfermi, fini, fondi, forgesi, frakasi, fuŝi, heredi, kapti, konfuzi, konstati, konsterni, konvinki, prunti, rekompenci, renkonti, ricevi, rifuzi, rimarki, savi, signi, solvi, sterni, surprizi, trafi, trovi. Kun ili, kompreneble, oni ne uzas la daŭr-subsencajn imperfektajn formojn (-anta, -ata), sed la rezult-subsencajn perfektajn (-inta, -ita): *mia ŝlosilo estis perdita* (ne: *perdata*).

La diferencon inter la verboj de daŭro sen rezulto kaj de rezulto sen daŭro klare montras, se oni uzas ilin en la nuntempo: *Petro memoras la melodion, Paŭlo ĝin forgesis*; ĉi tie oni esprimas, en la aktuala tempo, la memoron per -as kaj la forgeson per -is. Ties kaŭzo estas, ke la memoro daŭras dum tiu tempo, pri kiu oni parolas; male, la momento de la forgeso estas antaŭa al tiu aktuala tempo. Se nun oni uzas pasivon, la aktualan tempon signas "estas", al la "-as" de la memoro respondas "-ata" kaj al la "-is" de la forgeso respondas "-ita": *la melodio estas memorata de Petro, sed forgesita de Paŭlo*. Evidente tio validas ankaŭ por la paseo: *la melodio estis memorata de Petro, sed forgesita de Paŭlo*. Same: *ĉu vi perdis la ŝlosilon?* – *Ne, mi ĝin havas*. Pasive: *la ŝlosilo estas havata, ĝi ne estas perdita*. Do: *memorata = neforgesita; forgesita = nememorata; havata = neperdita; perdita = nehavata*.

Rim. II. La verbojn de daŭro sen rezulto oni povas transformi en rezultverbojn per la prefiksoido *ek*; nome, tiaokaze la rezulto de la ago-komenco (*ek*-verbo) estas la ago-daŭro mem: tio, ke io estis sciata, estas la rezulto de tio, ke *ĝi estis eksciita*. Do ĉiuj *ek*-verboj apartenas al la verboj de rezulto sen daŭro. Ankaŭ aliaj prefiksoidoj havas la saman efikon: ekz-e: *delogi, forpeli, ĝisatendi, trasenti* estas

verboj de rezulto.

Alifoj la verbo havas diversan karakteron laŭ diverse uzata sencnuanco: *ĉasi* estas daŭrverbo, se ĝi signas la agadon, sed rezultverbo, se ĝi estas uzata en la senco *ĉasakiri* (multaj birdoj estis ĉasitaj); la sencmodifo de la sekvantaj daŭrverboj estas montrata parenteze: (*tro-)**dorlotita* (malbona pro dorloto); *bone nutrita* (dika pro nutro); *li estas distrita* (senatenta); *la ŝuo estas uzita* (ne nova); *li estas turmentita* (aspektas laŭ tio); *li estas bone dorminta* (refreŝiĝinta per dormo); *lia eksterajo estas zorgita, flegita* (bonorda de flego, zorgo) ktp. Do – kiam per iom da sencmodifo la verbo esprimas tian agon, kiu povas havi rezulton, ĝi fariĝas rezultverbo, kaj la rezulto estas esprimata per perfekta tempo (-inta, -ita).

Rim. III. La daŭsencaj *imperfektaj formoj* (-anta, -ata) havas signifon parencon al la sufiksoido **ad**. Kaj same kiel **ad** esprimas krom la daŭro ankaŭ ripetadon, ankaŭ la imperfekto povas tiel funkcii. En tia senco, kompreneble, ĝi estas uzebla ankaŭ ĉe verboj sen daŭro: *tago post tago estas perdata per tiaj bagatelaĵoj; la varoj estos sendataj iom post iom*. Same, se temas pri ago ĝenerale valida, kutima, kvazaŭ sentempa, kie oni uzas eternan prezencon (vd. § 115 d.): *pasero ne estas kaptata per tamburado*. Tie ĉi klasiĝas ankaŭ la verbo *nomi* en la senco: alparoli iun per la koncerna nomo: *la arbo, sur kiu kreskas pomoj, estas nomata pomujo*²; *Roberto Fulton estas nomata tiu...*². Sed *nomi* povus havi ankaŭ alian signifon: doni al iu la nomon unufoje por ĉiam (bapti); tiaokaze ĝi, kompreneble, necesigus perfektan formon: *li estis nomita Petro* (iun tagon li ricevis tiun nomon). Sed tiu formo estas uzata preskaŭ nur en la senco: doni al iu ofic-titolon: *li estis nomita ministro* (*li estis nomata* signifus, ke oni alparolis lin per la nomo ministro). En tiu senco de rang-altigo, oni uzas ankaŭ la formon *nomumi*.

4. Ekzistas fine ankaŭ verboj **h i b r i d a j**, kiujn oni povas rigardi preskaŭ egale kiel verbojn de daŭro sen rezulto aŭ verbojn de rezulto sen daŭro; ekzemple *okupi* povas signifi: *preni en posedon* (rezult-verbo: la rezulto estas la posedo), sed ankaŭ *teni en posedo* (daŭr-verbo). (Ĉe la koncerna Lingva Respondo, en la frazo "kiam la malamikoj okupas nian urbon, ĝi estas en tiu momento okupata de ili", la imperfekto klariĝas per tio, ke **Z.** celis esprimi propre la malvolviĝantan *agon* de la okupado; kiam tiu estas finita, la urbo estas okupita). Tiaj verboj estas ekz-e: ĉirkaŭi, determini, karakterizi, lui, ravi, reprezenti, supozi, ŝirmi. Tie ĉi do oni povas uzi preskaŭ laŭplaĉe perfektajn aŭ imperfektajn formojn: *mi estas okupita aŭ okupata; vorto estas karakterizita aŭ karakterizata; ĉambro estas luita aŭ luata* ktp. **Z.** preferas ĉe tiuj verboj la perfektajn formojn en la pasivo, dum en la simpla aktivo li uzas ilin kiel daŭr-verbojn. Do: kiun io okupas, tiu estas okupita; kion oni luas, tio estas luita ktp. Ekz-e: *vi, Marinjo, estas efektive afliktita... Nu, kio vin tiel afliktas?*²

Rim. IV. Ĉe la alternsubjektaj verboj (kiuj povas havi personan aŭ ajan subjekton), ĉe persona aganto la verbo preskaŭ ĉiam estas rezulta. Ĥkz-e, en la frazo: *Petro baris la korton per heĝo*, la verbo *bari* evidente estas rezulta, ĉar la baro efektiviĝas nur, kiam la barado finiĝis. Sed, aliflanke, la *heĝo* mem daŭre plenumas la funkcion de la barado, do se la subjekto estas *heĝo*, la verbo *bari* estas daŭrverbo: *la heĝo baras la korton*. Same kiel *bari*, kondukas, inter aliaj, la verboj: armi, garni, ilustru, komenci, kovri, kroni, legitimi, ornamu, ŝtopi, vesti. Do, per kio oni armis,

garnis, ilustris, komencis, kovris ktp., tio armas, garnas, ilustras, komencas, kovras ktp. En la pasivo tiujn verbojn oni rigardas el la vidpunkto de persona aganto kaj uzas ilin en perfekta formo: *la viando estas garnita; la libro estas ilustrita; iu estas legitimita, kronita, ornamita, vestita; io estis ŝtopita.*

Ĉe tiuj verboj, laŭ strikta logikeco, oni devus uzi imperfektan formon, kiam la aĵa subjekto estas esprimata per agantadjekto (*la lago estis kovrata de folioj*) kaj perfektan formon, kiam ĝi estas esprimata per instrument-adjekto (*la lago estis kovrita per folioj*). Sed ĝenerale oni ne faras tian delikatan distingon kaj ĉe la pri-skribo de rezulta stato oni uzas la perfektajn formojn (-inta, -ita). Vd § 208 RIM I.

Entute, kiel resumon de la supra longa pritraktado oni povas diri, ke ĝenerale oni uzas perfektajn formojn, eĉ kiam ŝajne pli taŭgus imperfektaj. Nur en la sekvantaj okazoj nepras la imperfekta formo (-anta, -ata) kaj estas erara la uzo de la perfekta:

- a) ĉe la verboj de daŭro sen rezulto (vd. punkto 2);
- b) ĉe la emfaza esprimado de daŭro;
- c) ĉe esprimo de ag-ripeto.

Analogan, kvankam malpli detalan konkludon jam atingis D-ro Lippmann, la tiama Direktoro de la Akademia Sekcio pri la Gramatiko, kiu finis sian oficialan Raporton antaŭ la U.K. de 1932 per jena formulo: "Fakte ne estas malfacile trovi la ĝustan formon: ĝi rezultas el simpla konstato de la efektiva daŭro de la ago (-ata, se daŭranta; -ita, se finita)."

2. Kondicionalo, volitivo, infinitivo

111

Ĉe la neindikativaj modoj kaj la infinitivo, la afero estas alia. Nome, ni vidis (§ 99), ke ili havas nur unu simplan tempon, la komunan, kiu do povus esti rigardata kvazaŭ resuma por ĉiuj tri tempoj. Tamen, sen la helpo de la kunteksto, tiu komuna tempo ŝajnas prezenca. Kaj per la kompleksaj tempoj oni povas esprimi nur la rilatajn tempojn de la prezenco: *mi ne volas esti vane veninta; mi dezirus, ke mi estu irinta tien; ho, se tio jam estus farita!* Preterito kaj futuro do ne povas esti esprimataj.

Efektive, ĉe la infinitivo kaj volitivo ŝajnas sufiĉi tiu komuna, resuma formo. Infinitivo ja estas komplemento de predikato kaj ĝian tempon difinas la predikata tempo: *mi vidis lin fali; mi volis paroli* – esprimas, ke la falo aŭ la (volo de) parolo okazis en la tempo signita per la predikata tempo. Same pri la volitivo; ĝin oni trovas aŭ en rekta parolo: *li venu* – tiam la tempo estas evidenta; aŭ en dependaj propozicioj, kiuj havas la tempon relativan, do per sia prezenco montras la tempon de la ĉefpredikato (vd. § 270): *mi volis, ke li venu; li postulas, aŭ postulis, aŭ postulos, ke la pordo estu fermita*; alifoje la tempon de la ĉefpredikata volitivo montras tempa subprop-o: *finu vian taskon, antaŭ ol mi revenos* (futuro; kp. la paseon en: *mi postulis, ke li finu sian taskon, antaŭ ol mi revenos, sed li tion ne faris*).

Ankaŭ ĉe la kondicionalo, la futuro de la fiktiva ago preskaŭ ĉiam estas

esprimebla per la simpla komuna formo. Sed la preterito, esprimata per la sama formo, ofte povas naski konfuzon: *mi irus tien* esprimas nuntempan eventualecon; apenaŭ oni povas signi per la sama formo, ke tiu eventualeco jam pasis.

Pri tiu ĉi manko oni helpas ĉe la *aktivo* per tio, ke oni uzas kondicionalon perfektan por esprimi kondicionalan preteriton: *mi estus irinta tien*. Tiu ĉi kutimo pli kaj pli ĝeneraliĝas kaj nun ĝi jam ŝajnas preskaŭ regulo: oni aplikas tiun kompleksan formon eĉ tiam, kiam la senco estus klara ankaŭ ĉe la komuna simpla formo. Ekz-e, Z. skribas: *estus pli bone, se mia patrino min ne naskus*; hodiaŭ oni uzas la formon: *estus naskinta*. Des pli konsilinda estas la nuna uzado, kiam la simpla formo ne estus klara: *kaj ŝi diris: Kiu dirus al Abraham, ke Sara mamnutros infanojn?*² (= estus dirinta). Kaj tiun perfektan kondicionalon oni aplikas eĉ ĉe la verboj de daŭro sen rezulto, kie, kiel ni vidis (§ 110), oni ne uzas la respektivajn indikativajn formojn; krome, ĉe la verboj de daŭro kun rezulto, oni esprimas per tiu formo ankaŭ la daŭron, kiu do ĉe la kondicionalo ne estas distingata disde la rezulto: *mi estus lerninta, ĝis vi revenis, se...; se vi estus skribinta la taskon eĉ dum du semajnoj, ĝi tamen ne estus perfekta, ĉar vi ne povas atenti pri via laboro* (kp. *Kvankam la tasko estis skribata dum du semajnoj*).

Rim. Oni povus esprimi la preteriton per duobla kompleksa formo: *se vi estus estinta skribanta...*; sed tiaj pezaj formoj neniam estas uzataj. Tamen, ne malpli pezaj formoj doniĝas, se la kompleksan kondicionalon sekvas predikativo: *tio estus estinta bona; vi estus devinta esti pli diligenta*. En tiaj okazoj oni povus utiligi la kuntiritajn formojn: *tio estintus bona; vi devintus esti...* Estas certe, ke tiel oni ricevus tre oportunan formon de preterita kondicionalo, kiu, ĉe sia ununura formo, eĉ ne estus malfacila por uzo kaj kompreno, kiel la respondaj indikativaj formoj, ĉe sia triobla participo (vd. § 102).

Ĉe la *pasivo*, la afero estas iom alia. Ni jam menciis, ke la pasivo altiras la atenton pli al la ago, ol al la aganto; pro tio, oni pli subtile elsentas la tempo-nuancojn de la ag-esprima verbo. Do, ĉar en perfekta tempo oni forte sentas la esprimon de rezulto, oni uzas la perfektan kondicionalon por esprimo de preterito nur en la okazoj, kiam oni montras la rezulton: *se la mono estus perdita; pli bone estus, se mi ne estus naskita*; sed oni ne uzas ĝin, kiam temas pri evidenta daŭro: *estus konita, estus havita* ktp. Tiaokaze oni evitas la pasivon per oni kaj aktivo: *se oni estus lin koninta; se oni estus havinta*.

La kompleksaj tempoj en la praktiko

Parolante pri la praktika uzado de la kompleksaj tempoj, ni devas aparte pritrakti la aktivan kaj la pasivan voĉon.

112

A. — Aktiva voĉo

En la aktiva voĉo la kompleksaj tempoj estas uzataj precipe por esprimi

akcente staton estigitan de finita ago (perfekta tempo): *li estas mortinta; la firmo estas bankrotinta; la suno ankoraŭ ne estis leviĝinta, kiam ŝi ekvidis la palacon^z; ĉiuj aliaj de longa tempo estis forrintaj^z; kiam Boaz estis manĝinta kaj trinkinta kaj gajigis, li iris por kuŝiĝi^z. Kelkfoje, por esprimi akcente la daŭron de la ago (imperfekta tempo): *li estas vojaĝanta; kaj dum ŝi estis mortanta, la virinoj diris...^z*; aŭ per kontrasto emfazi la subitecon, neatenditecon de intervenanta okazaĵo: *Gideon estis draŝanta tritikon... kaj aperis al li anĝelo^z; viaj filoj kaj viaj filinoj estis manĝantaj kaj trinkantaj vinon... kaj jen granda vento leviĝis^z; dum via servanto estis faranta tion kaj alion, tiu malaperis^z. Malofte por esprimi intencon aŭ staton antaŭan al ago (predikta tempo): *li ekglitas kaj estas jam falonta^z; li fariĝis submajstro, kaj li estis faronta sian submajstran vojaĝon^z; komenciĝis la vintro: dum multe da monatoj nun estis regonta tie unu sola longa nokto^z; liaj lipoj ektermis, kvazaŭ li tuj estus ridonta^z.***

Sed tiajn tempojn oni sentas pezaj; jam en 1888 Z. avertis, ke "la formojn kunmetitajn oni devas uzi sole tiam, kiam la senco ĝin necese postulas"; Beaufront ne konsideris tiun konsilon, sed poste, sub la influo de Kabe, kiu ĉiam ilin evitis, oni uzas ilin kiel eble plej malofte. Plejofte oni aplikas la simplajn formojn.

Tamen, la simplaj tempoj ne ĉiam sufiĉas por esprimi klare la penson. Tio okazas, kiam du tempoj ne estas samtempaj: unu estas antaŭa aŭ posta al la alia. Kaj eĉ ĉe samtempaj agoj oni sentas kelkfoje la neceson de tio, ke oni akcentu, nepriĝu tiun samtempecon. Por esprimi tiajn rilatojn oni uzas prefere ne kompleksajn tempojn, sed aliajn rimedojn.

1. Por la i m p e r f e k t a j t e m p o j (t.e. por esprimi la samtempecon) oni havas la jenajn anstataŭaĵojn:

a) Se la samtempa ago estas de daŭro sen rezulto, tute sufiĉas la simpla formo: *mi konis lin* (ne: *estis konanta*), *kiam li estis infano*.

b) Se la samtempa ago estas ago rezulta, kun aŭ sen daŭro, la samtempecon oni povas esprimi per **tiam**: *mi manĝis tiam, kiam vi vokis min*.

2. Anstataŭ la p e r f e k t a j t e m p o j oni povas uzi:

a) Se la antaŭtempa ago estas ago de rezulto sen daŭro, la adverbbon **jam**: *mi jam finis (estis fininta), kiam sonis la kvina; li jam falis (estis falinta), kiam mi alkuris*. Tie ĉi klasigas ĉiuj verboj kun la prefiksoidoj **el**, **ĝis**, **for**, **tra** (vd. § 247): *li jam foriris, kiam mi venis; mi jam ellegis la libron*; en tiaj okazoj eĉ **jam** estas ofte superflua, se la temporilato estas klara el la senco: *kiam oni alportis la bieron, li verŝis al si^z*. Se la antaŭtempeco estas nur momenta, oni uzas **jus** kun simpla verbo: *li fus venis* (ne: *li estas fus veninta*).

b) Se la antaŭtempa ago estas ago de daŭro, sen aŭ kun rezulto, oni povas uzi simplan verbon, se unu ago logike antaŭas la alian: *mi legis la leteron, kiun vi skribis*; cetero oni uzas la adverbojn **jam antaŭe**: *li jam antaŭe rakontis al mi la aferon, kiam vi alvenis (li jam rakontis povus signifi, ke li jam komencis la rakonton)*. Sed pli elegante estas

esprimi la antaŭtempecon per **post** kiam en la sama, aŭ per antaŭ ol en alia propozicio: *li rakontis la aferon, antaŭ ol vi alvenis; post kiam li rakontis la aferon, vi alvenis*. En la unua frazo oni akcentas la antaŭtempecon de la rakontado, en la dua la posttempecon de la alveno. Kelkfoje oni uzas la prepozicion **post** kun ag-substantivo: *post almozula frapado ĉe multaj pordoj, Marta fine trovis laboron^z* (anst. *kiam ŝi estis almozule frapinta...*). Ofte oni povas uzi ankaŭ preteritan particon: *elleginte la libron, li ĝin forĵetis*.

La afero ne estas sama ĉe la kondicionalo: ĉi tie nome la perfekta tempo anstataŭas la simplan preteriton, kiu ne ekzistas en Esperanto: *mi estus leginta romanon, se...; oni ne trovos ĉe mi malbonagon, per kiu mi estus pekinta^z*. Tiuj ĉi formoj do ne estas anstataŭigeblaj per adverbaj esprimoj. Maksimume, se la senco estas klara, per la resuma formo komuna: *mi estus leginta romanon, se mi h a v u s*.

3. Por la **p r e d i k t o**, oni ofte povas esprimi ĝin helpe de verboj aŭ adverboj: *mi estas vojaĝonta Madridon la venontan vintron = mi projektas vojaĝi...; oni ĝuste estas fondonta akcian kompanion = oni estas preta por fondi...; en la jaro 1886 la lingvo Esperanto estis ankoraŭ aperonta = ankoraŭ ne aperis; ŝi estis vivonta ankoraŭ multajn jarojn = ŝi havis ankoraŭ multajn jarojn de vivo, por vivi; la muro estas disfalonta = baldaŭ disfalos; kiam abeloj estas forflugontaj, ili forte zumas = kiam abeloj estas antaŭ forflugado...; ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas egalan sorton^z = kiuj devas ludi...; se ĝi ne fariĝos nun, ĝi estas jam iam fariĝonta en estonteco = ĝi devas jam iam fariĝi^z; sed tio ne estas ĉiam ebla, precipe kiam temas pri intenco: *ŝi kuris al li renkonte, kvazaŭ ŝi volus lin kisi; ŝi tion ne faris, sed ŝi preskaŭ jam estis faronta tion^z*. Krome, ĉe la kondicionalo oni konservas la kompleksan formon: *liaj lipoj ekstremis, kvazaŭ li tuj estus ridonta^z*.*

Rim. En multaj okazoj, la ideo pri onteco konfuziĝas kun tiu de devo aŭ konvencio: tial oni povas ofte heziti inter la sufiksoj **ont** (-ot), -ind aŭ -end: *tio estas la sola metodo sekvinda* aŭ: *sekvota* aŭ: *sekvenda*. Sed estas okazoj, kiam oni devas distingi ilin: *daŭrigota romano* ne estas ĉiam *daŭriginda!*

Samkaŭze oni uzas **devi** kun signifo de simpla okazonteco: *prezentu al vi, kiel tiuj arboj devis brili en la suna lumo^z*.

B. — Pasiva voĉo

La pasiva voĉo estas iom malfacila en Esperanto. Nome, ĉe la aktivo oni uzas plejofte la simplajn formojn, kiuj havas nur unu tempo-distingilon (-as, aŭ -is, aŭ -os); tiujn facile estas apliki. Sed ĉe la pasivo la tempo estas duoble distingita: per la helpverbo, kaj per la particon; oni do devas decidi pri du tempo-distingiloj.

Multaj kredas, ke en la okazo de samtempeco oni devas apliki la tempo-distingilon nur unufoje. Do, ekz-e, se la frazon: *la ŝlosilo estas perdita* oni volas esprimi en estinta tempo, oni devas diri: *la ŝlosilo estis per-*

data, ĉar la pasinteco jam esprimas *estis*, do estas pleonasme ĝin esprimi ankaŭ per la participo.

Sed tia rezonado estas erara. Ni vidis (§ 110), ke la imperfektaj formoj (*-ata*) ne estas nur negativaj signoj de ne-antaŭtempeco, sed ili havas tre klaran signifon de ago-daŭro, aŭ, ĉe sendaŭraj agoj, de ripetado. *La ŝlosilo estis perdata* do havas la sencon, ke oni *ripete perdis* (perdadis) la ŝlosilon.

Krome, oni devas memori, ke la pasivo estas konjugacia formo, per kiu oni altiras la atenton sur la agon mem, ne sur la aganton; kiam oni diras: *la pordo estis malfermata* oni prezentas la agon mem multe pli draste, ol per: *oni malfermis la pordon*. Same: *ŝi estis vestata de siaj ĉambristinoj* esprimas la sinsekvon de la movoj multe pli elvokive, ol: *ŝin vestis siaj ĉambristinoj* kaj la responda aktiva formo estus: *ŝin vestadis siaj ĉambristinoj*, kun la daŭra aspekto (vd. § 102. Rim.). Nu, en la kuranta rakonto oni ne bezonas insisti pri tiu daŭro de la ago, kaj sekve oni uzas prefere la perfektajn tempojn, eĉ kiam falsa logiko ŝajnus postuli la imperfektajn: *ĉi tiu demando estis farita per tono ĝentila*² (= oni faris); *al la lernoknabo estis ordonite* (= oni ordonis) *alporti botelon da vino*; *kaj ĝi estis metita* (ĝin oni metis) *en la korbon de la manĝaĵoj al la jam tie troviĝantaj ŝinko, kolbaso kaj fromaĝo*².

Rim. I. Tiu punkto mirigas kelkajn spiritojn kutimiĝintajn al geometria (almenaŭ eŭklida!) pensmaniero: ili opinias, efektive, ke, se ago daŭras tian tempon, ke tion oni devas signi per aparta formo (ĉi tie per *-ata*), tio estas vera en ĉiaj okazoj, ĉu la ago lokiĝas en la pasinteco, en la nuno aŭ en la estonteco. Sed tiu veraĵo estas iluzia. El la psikologia vidpunkto, daŭro estas klare perceptebla nur en la nuntempo: pri la pasinteco aŭ pri la estonteco nia memoro aŭ nia imago nature prezentas al si agon kiel punkton en la tempo; kaj por pentri al si la malvolviĝon de ago en tiuj du cirkonstancoj, necesas aparta penado de la spirito, kiun ni faras kompreneble nur, kiam tio estas bezonata. Por klarigi la aferon, supozu reporteron, demandantan al pedelo, kio okazas en la palaco: "*Nun, tiu respondas, la parlamenta delegacio estas akceptata de la reĝo*". Sed la reportero skribas, por sia morgaŭa artikolo: "*Hieraŭ la parlamenta delegacio estis akceptita de la reĝo*". Ĉar en tia okazo, la interesa afero estas, ke la akceptiĝo normale atingis sian finon, kaj ne, ke ĝi pli-malpli rapide malvolviĝis. Male, se li volus noti detalon, li skribus: "*Dum la parlamenta delegacio estis akceptata de la reĝo, unu parlamentano rivercanta falis*".

Rim. II. La perfektaj tempoj preteritaj (*estis -ita*) do ne respondas al la pluskvamperfekto; ili ne esprimas nepre antaŭtempecon:

a) ĉe la verboj de daŭro sen rezulto ili ne povas ĝin esprimi, ĉar ili, kiel ni vidis, tute ne estas uzataj. Oni ne diras: *li estis konita*, sed: *antaŭe li estis konata*.

b) ĉe la verboj de rezulto sen daŭro ili ne povas ĝin esprimi, ĉar ili estas la sole uzataj formoj.

La pluskvamperfekto en Esperanto propre estus: *estis estinta -ata* (daŭro-verboj) kaj *estis estinta -ita* (rezult-verboj): *li estis estinta konata*; *ĝi estis estinta turnita*. Estas kompreneble, ke anstataŭ tiuj pezaj formoj oni prefere uzas klarigajn adverbojn (vd. § 114).

* * *

Ĉe la pasivo do oni uzas la *imperfektajn* tempojn (-ata) en la sekvantaj okazoj:

1. ĉe verboj de daŭro sen rezulto: *mia nomo estas konata ĉe kortego^Z; lia peto ne povis esti malŝatata^Z; ŝi amis kaj estis amata^Z.*

Rim. III. La du solaj esceptoj troviĝas en "Fabeloj" (IV, p. 111): *nun ĝi* (glaso) *finis sian servadon kaj estis amita. Kun la filo de Anneto la afero estis alia! Tamen en la ĉiela regno neniu animo povos plu diri: "Li neniam estis amita!"* La strangeco de la penso (komparo inter la sorto de glaso rompita post uzado kaj de homa animo, kiu ĝuas la amon de Dio nur post la morto) kaj la izoleco de tiuj du formoj en la tuta verkaro de Z. faras, ke oni ne povas konsideri ilin ĉe la formulado de la regulo.

2. ĉe verboj de daŭro, kun aŭ sen rezulto, kiam oni akcentas la disvolvigon de la ago: *ĉi tie infanoj ludadis, dum en la sinagogo estis legata la semajna partaĵo^Z* (dum klare montras, ke temas pri ago-daŭro); *per sia naskiĝo ŝi estis rigardata kaj sin mem rigardis kiel virinon kleran^Z; Polonio estas ne kie li manĝas, sed kie li estas manĝata^Z; la viroj estas pli dezirataj, kiam la afero koncernas instruadon^Z; mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn^Z.*

3. ĉe verboj de daŭro aŭ sen daŭro, kiam temas pri ripetado, aŭ pri plurfoje aplikebla, kvazaŭ proverba konstato: *la garboj en la daŭro de multaj jaroj estis nomataj la garboj batalaj kaj metataj aparte^Z* (temas pri ĉiujara ripeto); *tra longa tempo kun ĉiu farita sulko estis trovata postesigno de la batalo^Z; ŝi ne sciis, ke kio estas permesata al Jupitero, ne estas permesata al bovo^Z* (proverba diro plurfoje aplikebla; kp. *mi sopiras ĝis tiu momento, kiam estos al ni permesite...^Z*); *tiaj oficoj estas bone pagataj* (ĝenerale). Same en la aliaj modoj: *Allah estu laŭdata (K)*; *ni devas celadi al tio, ke pli aŭ malpli frue ĉiuj nomoj estu skribataj laŭ la fonetiko internacia^Z; mi prenos aerostaton: mia patro scias, kiel ili devas esti pretigataj kaj direktataj^Z.* Pri nomi vd. § 110, Rim. III.

4. ĉe verboj sen daŭro, por tre precize insisti pri samtempeco kun alia sendaŭra ago: *la ĉevalo estis fotografata ĝuste, kiam ĝi levis la antaŭajn piedojn.* Tio estas kompreneble tre malofta; estas dube, ĉu estas eĉ unu ekzemplo en la tuta Z-a verkaro.

Rim. IV. Z. tiel delikate sentis la diferencon inter la plenumiĝado kaj la plenumiteco de ago, ke fojfoje li hezitis uzi la ita-formon en la okazoj, kiam temis pri ago kvazaŭ teorie konceptita, ekster ĉia ideo pri efektiviĝo: tian uzon oni povas nomi *abstrakta imperfekto*. Ĝin oni trovas ĉefe en du okazoj:

a) ĉe neado: *la unueco de Esperanto neniam estos rompata; ŝi devis vikle salti sur grandan ŝtonon, por ne esti renversata;* (Kp. § 253).

b) ĉe la infinitivo post la modaj helpverboj *povi, devi, voli* kaj ĉe la volitivo: *ĉi tiu verko devas esti eldonata nun aŭ neniam; kiam la ĝardeno devis esti ŝlosfermata, la pordisto lin elpelis; estas necese, ke ĝi estu libervole akceptata, sed ne leĝe altrudata.* Tiuj nuancadoj, kiujn cetere Z. ne ĉiam observis, ne estis post li imititaj kaj restas zamenhofismoj.

114 En ĉiuj aliaj okazoj oni uzas la *perfektajn* tempojn (-ita). Tio estas:

1. Ĉe verboj de rezulto sen daŭro ĉiam, kiam ne temas pri ripetado: *la kaleŝo estis antaŭ la pordo*; *la pakaĵo estis surmetita^Z* (oni surmetis ĝin poste); *la taglumon ĝi denove ekvidis nur tiam, kiam en la kelo de vinkomercisto ĝi kune kun siaj kamaradoj estis elpakita kaj la unuan fojon tralavita^Z* (= kiam oni elpakis ktp.); *tiu propono estis akceptita^Z* (oni akceptis); *Vaŝington estis naskita la dudekduan de Februaro^Z* (oni naskis lin); *ili estos donacitaj, li diris, al la malgranda Kristino^Z* (mi donacos ilin); *kial al li estus permesite ekspluati...^Z* (oni permesus); *ĉu vi volas esti forpelita?^Z* (ke oni forpelu vin); *mi estas tro maljuna por esti ankoraŭ konvertita^Z* (ke oni konvertu min). Kiel oni vidas, en ĉi tiuj ekzemploj nenie temas pri antaŭtempeco: en la aktivo oni uzus simplan verboformon.

Rim. Ni jam diris (§110. 4.), ke pluraj verboj estas rigardeblaj egale kiel daŭraj sen rezulto aŭ rezultaj sen daŭro (*okupi, ravi, ŝirmi* ktp.). Ni menciis, ke Z. uzas ilin prefere en perfektaj formoj, pro tio, ke ili esprimas plie rezultaton ol agodaŭron, almenaŭ en nia konscio: *13 registaroj estis oficiale reprezentitaj^Z* (sin reprezentigis); *mi estas afliktita^Z* (io min afliktas); *li estas okupita^Z* (io lin okupas); *pardonu, Marinjo, mi estas tiel ravita^Z* (io min ravas); *ni estas ŝirmitaj kontraŭ la vento* (io nin ŝirmas).

2. Ĉe verboj de rezulto, kun aŭ sen daŭro, kiam oni esprimas la rezulton de finita ago. Ĉi tie oni devas okupiĝi aparte pri la tempoj prezencaj kaj futuraj unuflanke, kaj pri la tempoj preteritaj aliflanke.

a) Ĉe la tempoj prezencaj (*estas -ita*) kaj futuraj (*estos -ita*) la pasinta tempo de la participo klare montras, ke la ago, kiun la participo esprimas, estas antaŭtempa al la stato, kiun ĝi estigis, kaj kies tempon montras la helpverbo: en "*tio estos farita*" la *faro* estas antaŭtempa al la stato de preteco, kiun la helpverbo *estos* lokas en la futuro. Pro tio, tiu *faro* estas antaŭtempa ankaŭ al alia ago aŭ stato esprimita per la sama verbotempo: en *kiam vi venos, la afero estos farita* la plenumiĝo de la *faro* estas antaŭtempa al la estonta *veno*. Do en prezenco kaj futuro la perfektaj tempoj estas taŭgaj por la esprimo de antaŭtempeco: *la verko ne sole ne estas tradukita el la originalo...^Z* (mi ne tradukis); *la vizaĝo de la juna virino estas desegnita de vi kun videbla sentemeco^Z* (vi desegnis); *ĉiuj artikoloj estas skribitaj de mi mem^Z* (mi skribis); *se vi estos venkita, oni diros* (oni diros post la venko); *mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ^Z* (baldaŭ mi estos post pago).

Jam en tiuj ĉi ekzemploj estas evidente, ke la perfektaj tempoj esprimas staton estigitan de ago. Ankoraŭ pli evidenta estas tio en la sekvantaj frazoj, kie la participo kvazaŭ anstatataŭas adjektivon: *tiu kapo sur la bildo estas iom klinita antaŭen^Z* (oblikva); *Dagon estas ruinigita^Z* (mi-zera); *mia mano estas ĉiam malfermita por tiuj, kiuj suferas^Z* (preta doni); *se daŭre de du minutoj apud vi ŝi enuos, vi estos perdita^B* (abomena al ŝi); *malbenita estu, kiu forklinas la rajton de orfo kaj vidvino^Z* (kondamninda). Tiujn formojn oni povus nomi s t a t a j t e m p o j.

b) ĉe la preterita tempo (*estis -ita*) la afero estas alia. Ni vidis, ke tiuj tempoj povas signi simplan pasintecon, eĉ, ke ili estas la sole eblaj formoj ĉe verboj de rezulto sen daŭro (se ne temas pri ripetado). Do se iu diras: *la ŝlosilo estis perdita, kiam vi lin vizitis* — oni ne scias certe, ĉu tiu perdo estis antaŭa aŭ duma rilate al la vizito. Tial en tiaj okazoj la tempon oni precizigas per adverbo: *jam* (se la ago estas momenta), *antaŭe* (se ĝi estas daŭra): *tiu parto (de la botelo), kiu antaŭe estis turnita supren, nun estis turnita malsupren^Z; la ŝlosilo estis jam perdita, kiam vi lin vizitis; aŭ (por montri samtempecon): la ŝlosilo estis tiam perdita, kiam vi lin vizitis.*

Tamen, tio estas nenecesa, kiam la antaŭtempo estas evidenta el la teksto: *la historio rakontis pri hungara kavaliro, kiu estis kaptita de turka guberniestro^Z* (la okazaĵo kompreneble estas antaŭtempa al la rakonto pri ĝi temanta); *ŝi sidiĝis sur seĝo, kiu antaŭ momento estis donita al ŝi^Z* (la antaŭtempo estus klara ankaŭ sen la adjekto: "antaŭ momento"; tiu ĉi servas nur por precizigi la momenton de la *dono*). Ĉiam evidenta estas la antaŭtempo ĉe la stataj tempoj. Ke la tempo estas stata, tion montras ofte la kunteksto: *Snitchey kaj Craggs estis edzigitaj^Z* (= estis edzoj: ne temas en la kunteksto pri aktuala edzigo); *la pala delikata buŝo estis fermita kaj silenta^Z* (la statan tempon neprigas la adjektivo *silenta*; momentan agon montrus: *estis fermita kaj poste silentis*).

Rim. I. En kelkaj okazoj povas ekesti dubo, ĉu la preterita perfekto havas la signifon de ago plenumita kiel fakto aŭ de stato post ago: *hieraŭ la ekspozicio estis malfermita antaŭtagmeze* (ĉu oni malfermis ĝin en la antaŭtagmezo, ĉu ĝi estis vizitebla: nur dum tiu tempopeco?). La unua signifo estas ordinare precizigita de tempa adjekto (*hieraŭ la ekspozicio estis malfermita je la naŭa*), la duan oni povus nepriigi per la uzo de *stati* anstataŭ *esti* (*hieraŭ la ekspozicio statis malfermita antaŭtagmeze*).

* * *

Por pli bone senti la diferencon inter la *ata-* kaj la *ita-*formoj, oni komparu ties uzon ĉe samaj aŭ analogaj verboj en jenaj frazoj, tiritaj el la Fundamento (Ekzercaro § 25): *tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi* (ripeto); *la surtuto estas aĉetita de mi, sekve ĝi apartenas al mi* (rezulto) — *Kiam via domo estis konstruata* (daŭro), *mia domo estis jam longe konstruita* (stato) — *Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi* (ripeto); *estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ* (unufoja ago) — *Mia ora ringo ne estus tiel longe serĉata* (daŭro), *se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi* (unufoja ago);

kaj el la Zamenhofaj verkoj: *mi preferas* (diras la malbela anasido) *esti mortigita de ili* (unufoja ago), *ol esti pinĉata de la anasoj, pikata de la kokinoj, puŝata de la servistino* (ripeto) — *Ŝi alportis floron...* *Ĝi estis portata kun tia zorgemeco kaj singardeco, kiun oni ne uzis eĉ por la delikata pomarba branĉo* (emfazo pri daŭro); *ĝi eliris en la mondon por*

lin serĉi kaj trovi, kaj nun li estis trovita kaj portita hejmen en la malgrandan ĝardenon (stato); aŭskultu Min, domo de Jakob..., kiuj estis ŝargitaj (unufoja ago) sur Mi de post via naskiĝo, kiuj estis portataj de Mi (kutimo) de post via eliro el la ventro – Lia butiko dum du tutaj tagoj ne estis malfermita (simpla ago); ĉiu restadis en sia butiko, kiu estis fermata frue vespere (kutimo).

* * *

Resume: Se en certa okazo oni volas ekscii, kiun formon oni uzu, oni povas procedi jene:

1. Oni formu el la verbo pasivan participon preteritan, kaj oni esploru la ideon, kiun tiu participo izolite elvokas:

a) la participo elvokas ideon pri ĉeso de ago; tiun ideon oni povas senmanke esprimi per la neata prezenca participo: *konita* signas nenion alian ol *ne plu konata*, aŭ *jam ne konata*; same: *memorita*, *tenita*, *sciita* ktp. Se la verbo estas tia, oni povas uzi nur kaj sole la imperfektan formon (kun *-ata*), ĉar temas pri verbo de daŭro sen rezulto.

b) la participo elvokas ideon pri stato, pri rezulto, pri preteco kaj oni tute ne pensas pri tio, ke la ago mem jam ĉesis; aŭdante: *konstruita*, *perdita*, oni sentas akcentita ne la *ĉeson* de la agoj *konstrui* kaj *perdi*, sed ilian *plenumiĝon*. Se la verbo estas tia, oni uzu:

imperfekton (*-ata*), por esprimi ago-daŭron, aŭ ripetadon aŭ koincidon kun alia samdaŭra ago;

perfekton (*-ita*), ĉiam cetere.

2. Por kontrolo, oni transformu la verbon en aktivan kaj almetu *ad*. Se tio ne ŝanĝas la sencon, oni uzu *-ata*; se *ad* ne taŭgas, oni uzu *-ita*. Kp. ekzemple: *mi, kiu vokadis al Dio kaj estis aŭskultata*² (Ijob XII 4).

Ekz-e: *la letero estis skrib?ta hieraŭ – oni skribadis la leteron – ad ne taŭgas, ĉar ĝi ne esprimas, ke la letero iĝis preta, do skribita; la domo estis konstru?ta dum du jaroj – oni konstruadis – ad ne ŝanĝas la sencon, do konstruata; la ŝlosilo estis perd?ta – oni perdadis – ad ne taŭgas, do perdita; la tagoj estis perd?taj per bagatelaĵoj – oni perdadis, do perdataj; la leĝo estis akceptita; la kunsido estis malfermita (ĉar oni ne akceptadis, nek malfermadis ilin).*

Se la verbo estas preterita, oni esploru, ĉu la antaŭtempeco ne estas esprimenda por eviti konfuzon; t.e. ĉu ĝin sufiĉe certigas la kunteksto. Se ne, oni uzu la adverbojn *jam* (ĉe sendaŭraj verboj) aŭ *antaŭe* (ĉe daŭrverboj).

Rim. II. Oni povas uzi ankaŭ la simplan rimedon montritan de R. Schwartz: uzu *-ata*, kiam vi povas, sen ŝanĝo de la senco, aldoni *plu-kaj-plu* aŭ *re-kaj-re*; uzu *-ita*, kiam vi povas aldoni *definitive*.

Valoro de la tempoj

115

1. La *p r e z e n c o* estas uzata por esprimi:

a) tion, kio okazas en la momento, kiam oni parolas: *"Efektive, mi re-*

memoras”, *ŝi eldiris post momento²; nun li diras al ni la veron.*

b) tion, kio estas kutima, ordinara: *en vintro oni hejtas la fornojn²;*

c) tion, kio okazas de certa tempo ĝis nun, kaj eble plu: *jam de du jaroj daŭras la malsato; ekde sia infanaĝo li estis malgrasa.*

d) tion, kio estas vera en iu ajn tempo: *la vero ĉiam venkas²; prokrastita ne estas perdita²; du kaj du faras kvar; se tio estas vera, la malo estas falsa.* Tion oni povas nomi *eterna prezenco*, aŭ *gnomika prezenco*, kiam temas pri proverbiaj esprimoj (*altan arbon batas la fulmo²; lupu kaptas, sed ankaŭ enfalas²*).

e) tion, kio okazis en la inteco, sed kion oni prezentas pli vive, pli draste, kvazaŭ ĝi nur nun okazus: *Herodoto rakontas en sia historio, ke...; ne suspektante ion, ili iradis tra la arbaro. Subite eksonas pafo...; li songis: jen ŝtuparo staras sur la tero²; "levu la kovrilon!"*. Lia ordono estas *plenumata²*. Tiun lastan uzon oni nomas *historia prezenco*.

f) tion, kion oni kvazaŭ oficiale kaj insiste deklaras, kvazaŭ ĝi havus senliman valoron: *la tribunalo kondamnas la akuziton je du jaroj da mallibereco; la komisiono konfirmas la konstru-planon.* Tion oni povus nomi la *administracia prezenco*.

g) tion, kion oni citas, kvazaŭ revivigante la momenton de la citaĵo: *Platono skribas, ke...; kiel Aristotelo diras...; Plinio asertas, ke...* Tion oni povus nomi *prezenco de citado*.

Rim. I. Male, oni neniam uzas la prezencon pri okazantaĵo: *li forvojaĝos morgaŭ; mi tuj malsupreniros! se li ekscios tion, li forte koleros.*

2. La p r e t e r i t o estas uzata por esprimi:

a) tion, kio okazis antaŭ la momento, kiam oni parolas: *hieraaŭ li diris al mi la veron²; Sokrato mortis ĉirkaŭ 400 a.K.;*

b) tion, kio kutime, ordinare okazis en la inteco, sed ne plu okazas: *tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon².*

3. La f u t u r o estas uzata por esprimi:

a) tion, kion oni opinias okazonta post la momento, kiam oni parolas: *li diros al mi la veron²; vi ne eliros, mi baros al vi la vojon.*

b) tion, kion oni volas, ke iu faru: *venu, ni vendos lin²; prenu el la unuaj fruktoj... kaj metu en korbon... kaj la pastro prenos la korbon kaj metos ĝin antaŭ la altaron²; kaj vi adorkliniĝos antaŭ la Eternulo².*

c) tion, kies okazivecon oni antaŭvidas: *se vi aĉetos sklavon hebreon, li servu dum ses jaroj²; se bovo kornobatos viron, kaj tiu mortos, tiam oni ŝtonmortigu la bovon².*

Rim. II. En tiu senco la futuro estas regule uzata en la formulado de leĝoj, korelativaj kun la volitivo.

UZADO DE LA MODALOJ KAJ MODOJ

Tie ĉi ni nur skize pritraktos la uzadon de la modaloj kaj modoj; detala studo sekvas en la sintakso de la frazo, ĉe la diversaj specoj de propozicioj.

a) La **indikativo** estas uzata:

1. se temas pri ago prezentata kiel reale okazanta, okazinta aŭ okazonta: *mi dubas pri tio* (mia dubo estas nuna realaĵo); *li ne volis cedi* (lia rifuzo estis realaĵo en la intenco); *mi alvenos morgaŭ* (tiu alveno estas por mi realaĵo en la onteco).

2. se temas pri nur ebla ago, dependanta aŭ ne de kondiĉo: *oni gajnas nur, se oni riskas*; *se iu fariĝos kulpa pri peko, kiu meritas morton... vi devas lin enterigi en la sama tago^Z*; *povas esti, ke mi venos*; *ĉu estas eble, ke mi ĉiam estos venkita de ŝi?^Z*

b) La **kondicionalo** estas uzata:

1. se temas pri ago nereala, fiktive imagita: *se mi estus sana, mi estus feliĉa^Z*; *se li sciis, ke mi estas tie ĉi, li tuj venus^Z*; *se la lernanto sciis bone sian lecionon, la instruanto lin ne punus^Z* (sed li ne scias ĝin!); *Dio ne estas homo, ke li mensogus, kaj ne homido, ke li pentus^Z* (se li estus tia, eble li tion farus; sed li ne estas tia); *ĉu Li dirus kaj ne farus, parolus kaj ne plenumus?^Z* (kompreneble ne!); *estus pli bone, se mi forirus.*

2. se temas pri ago, kies plenumiĝon oni deziras sed tamen konscias neebla: *ho! se mi havus rifuĝejon!^Z ho, se ni estus mortintaj en la lando egipta!^Z ho, se mi estus pereinta, ke nenies okulo min vidu!^Z ho, se vi estus al mi kiel frato!^Z*

3. se temas pri peto aŭ demando, kiun oni, pro ĝentileco, prezentas kvazaŭ neefektiva: *mi dezirus aĉeti tiujn gantojn*; *ĉu mi povus havi panon? mi volus scii, ĉu...*

Rim. I. Ĉe devi, povi kaj voli la kondicionalo signifas, ke la devo aŭ povo aŭ volo estis ja reala, sed ke oni ne obeis la devon aŭ uzis la povon: *mi povus foriri* (sed mi ne foriras); *li devus labori* (sed li ne laboras); *li estus devinta veni* (sed li ne venis); *vi estus povinta diri la veron* (sed vi ja ne diris); *mi volus helpi al vi* (sed ne povas). La indikativa preterito tiaokaze signifas, ke oni obeis la devon aŭ uzis la povon: *mi devis labori* (kaj mi laboris); *mi povis fari multe* (kaj mi efektive faris); *tion mi volis fari* (mi intence faris). Z-aj ekzemploj: *tiu ĉi malfeliĉa knabino devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon*; *pri tio oni tute ne devus ridi, ili tamen ridis*; – *la tutan tempon ili povis ludi en la palaco*; *vias desegnaĵoj povus esti por mi tre utilaj, sed...* – *la Eternulo volis tiel lin turmenti*; *volus kato fiŝojn, sed la akvon ĝi timas.*

c) La **volitivo** estas uzata:

1. se temas pri ago, kies plenumiĝon oni deziras kaj konscias ebla: *iru for!^Z li venu, kaj mi pardonos al li!^Z se mi pereos, mi pereu!^Z ho, venu la vespero!^Z*

2. se temas pri ago ne reala, sed ebla, kaj petata, volata, ordonata de iu, aŭ trudata, necesigata de io; *ordonu al li, ke li ne babilu^Z*; *permesu al malriĉa homo, ke li ion petu de vi^Z*; *la virinoj ne estas ankoraŭ edukataj tiamaniere, ke ili povu alkonformiĝi al la despoteco de la ciferoj^Z*; *estas necese, ke ĉio finiĝu por ni^Z*; *jam ne multe mankis, ke mi faru tre fundajn esplorojn^Z.*

3. se temas pri ago ne reala, probabla aŭ ne, kiu plenumiĝos eventuale nur pro ies volo: *kiun lokon mi legu al vi?*² (= vi volas, ke mi legu...); *se mi faru riverencon, mi elektas potencon*²; *vi mortigis mian amaton, kaj mi nomu vin mia edzo?*² (= kaj vi volas, ke mi nomu...); *al miaj gepatroj mi ne diris la solvon, kaj al vi mi ĝin diru?*² *kial mi perdu vin ambaŭ en unu tago?*² *ili volis partopreni en la ĝojo, kaj kial la bestoj tion ne faru?*² *la rimon, kvankam estu ĝi plej frapa, ne gardu, se ĝia teno al vi kostus troe.*

d) La m o d a j h e l p v e r b o j (*voli, devi, povi*) havas la jenajn specialaĵojn:

a) ilin sekvas ĉiam infinitivo. Kiam *voli* ŝajnas havi akuzativan objekton, oni subkomprenas havi: *mi volas* (havi) *panon*.

b) ili similas al la volitivo en tio, ke ili same ne esprimas agon faktan, sed nur la (eventualan) estontan plenumon de la ago.

c) *povi* kaj *devi* havas neregulan pasivon. Anstataŭ *estas devate* oni diras: *estas necese, necesas*; kaj *estas povate* esprimiĝas per *estas eble, eblas*.

d) ili esprimas sian sencon el la vidpunkto de la subjekto, kiu sentas la devon, povon, volon, dum la volitivo esprimas eleksteran volon, povon, eblon. Do, se temas pri elekstera efiko, oni devus tion esprimi per aparta propozicio, kaj la efikatan agon mem per volitiva subprop-o; *estas eble, nenecese, oni volas, ke ili faru...* Tamen, la eleksteran devon oni esprimas plej ofte ne tiamaniere, sed aŭ per *esti devigita* aŭ per simpla *devi*; last-okaze la sencan certigas la kunteksto: *mi devas tion fari* (mi rekonas la devon); *li devis fiaski* (la cirkonstancoj lin devigis). Praktike tia uzo de *devi* apenaŭ povas estigi dubsencecon, tial aparta moda helpverbo por tiu ĉi lasta senco ne estas necesa. Pri la rekono, sed neobeo de devo vd. ĉi-supre Rim. I. Pri la neado de devo, vd. § 91, Rim. I.

Rim. II. Kelkfoje oni elipsas la ĉefprop-on kun *voli*, kiam ĝi kaj ĝia subjekto estas klaraj el la kunteksto. Ekzemplojn vd. supre ĉe la volitivo (punkto 3). Tie ĉi klasiĝas ankaŭ la volitivo post se (vd. § 257. Rim. VII).

Infinitivo

La infinitivo estas uzata:

1. kiel predikato anstataŭ volitivo: *ne ekpepi!*²; *ne movi la buŝon!*²
2. kiel predikato, anstataŭ indikativa prezenco, futuro aŭ kondicionalo, ĉe ekkriaĵ, demandaj aŭ hezitesprimaj frazoj: *ho ve! Malesperi kaj tamen ne morti!*²; *ĉu piki lin per mia halebardo?*²; *Sed kiel ĵuri?*²; *mi scios, kion diri?*²; *se lin kompari kun la nuna reĝo, li estis Apolono ĉe Satiro*². (Vd. §§ 155 kaj 166).
3. kiel objekta predikativo en atribua ag-propozicio: *li sentis sin fali, mi aŭdis lin fermi la pordon*. (Vd. § 172, 233)
4. krom tiuj vere verbaj uzoj, la infinitivo, pro imito al la hindeŭropaj lingvoj, estas ankaŭ uzata, kun valoro de substantivo, en la diversaj okazoj, en kiuj estas uzata ankaŭ la substantivo:

a) kiel subjekto: *morti pro la patrujo estas agrable^Z* (= morto);
 b) kiel objekto: *vi amas preni, amu redoni^Z* (vi amas la prenatalon, amu la redonalon); *li ordonis venigi al si la reĝinon^Z*; *instruu min kalkuli* (= instruu al mi la kalkuladon); *la sinjorino petis de ŝi trinki^Z* (Vd. § 180).

c) kiel predikativo: *flati al iu ne estas fari al li servon*.

d) kiel suplemento: *estas tempo por morti kaj tempo por naski^Z*; *ho, malbenita rapideco flugi en kriman liton!^Z preta al vi servi!^Z*

e) kiel adjekto: *jen vi iras dormi kun viaj patroj^Z*; vd. § 186.

Sed Esperanto neniam konfuzas tiujn du apartajn vortspecojn, kaj speciale ĝi zorge distingas la determinilojn de la infinitivo disde tiuj de la substantivo:

aa) Infinitivo, eĉ en valoro de substantivo, povas esti determinata per adverbo kaj akuzativa suplemento: *ĉiam diri la veron estas la devo de honesta homo*. Male la substantivo ne povas havi tiujn determinilojn, sed apud ĝi la adverbo iĝas adjektivo, kaj la akuzativo iĝas prepozitivo: *la ĉiama dirado de la vero...*

bb) Infinitivo, eĉ en valoro de substantivo, neniam povas havi antaŭ si la artikolon: *sciĝi la sekreton* iĝas, se oni almetas la artikolon: *la sciado de la sekreto*.

cc) Dum la baza ligilo de suplementa substantivo estas **de** post substantivo (*deziro de venĝo*) kaj **je** post adjektivo (*preta je venĝo*), la infinitiva suplemento ne havas bazan ligilon (*deziro venĝi, preta venĝi*). Kelkfoje oni trovas **por** (*estas tempo por morti^Z*) sed ĝi estas ellasebla (vd. § 141 Rim.).

dd) Dum la adjektaj substantivoj staras en akuzativo aŭ kun prepozicio, infinitivo ĝenerale ne toleras prepozicion antaŭ si. Nur tri prepozicioj estas kutime uzataj antaŭ infinitivo: **anstataŭ**, **krom** kaj **por**: *anstataŭ blinde babiladi, rigardu la faktojn^Z*; *vi nenion povas fari, krom kunbati la dentojn^Z*; *por ŝafon formanĝi, lupoj ĉiam trovas pretekston^Z*. Malofte **inter**: *inter voli kaj fari estas grandega paŝo^Z*. **Antaŭ** povas regule enkonduki infinitivon dank' al la intermeto de la subjunkcio **ol**: *antaŭ ol viziti lin, vi faros prudente, se...^Z*

Rim. I. Zamenhof ("Lingvaj Respondoj" n-ro 128) pravigis la uzon de **anstataŭ** kaj de **por** per tiu konsidero, ke, en tiu pozicio, ili "havas la sencon ne de pura prepozicio, sed preskaŭ de konjunkcio" (= subjunkcio); pri **krom** kaj **inter**, oni povus diri, ke la sekvanta infinitivo akiras iom el la karaktero de citaĵo. (G.W.)

La aliajn prepoziciojn oni anstataŭigas diversmaniere.

Lokaj prepozicioj neniam estas bezonataj antaŭ infinitivo.

El la tempaj ni jam parolis pri **antaŭ ol**. La analoga formo **post ol** ne estas uzata; oni helpas sin per preterita particip-adverbo: *dirinte tiujn vortojn, li foriris* (ne: *post ol diri...*). **Dum** kaj **ĝis** postulas (subjunkcie) plenan prop-on: *dum li skribis, li ofte alrigardis* (ne: *dum skribi*); *li kuris, ĝis li falis* (ne: *ĝis fali*).

Malgraŭ kaj **pro** estas anstataŭigataj per particip-adverboj: *eĉ falinte li*

batalis plu (ne: *malgraŭ fali...*); *li ne povis skribi ne havante inkon* (ne: *pro ne havi inkon*). Same **kun**: *li venis sciigante* (ne: *kun sciigi*). **Sen** estas anstataŭigata per particip-adverbo kun negacio: *mizero faras viziton, ne atendante inviton²; peno malaperi nevidate²; li foriris ne ŝlosinte la pordon*.

Rim. II. Tamen, ankaŭ Z. mem uzis sen antaŭ infinitivo (vd. § 255 B.).

Participo

La uzadon de la participaj formoj akompanataj de la helpverbo **e s t i** ĉe la malsimplaj tempoj de la konjugacio ni jam studis (§§ 112-115). Restas nur studi la uzadon de participoj sen helpverbo. Participon tia-okaze oni uzas:

1. kun verba valoro:

- a) kiel objektan predikativon en atribua agpropozicio, post verboj de sensado: *mi vidis virtulon forlasita, kaj liajn infanojn petantaj panon²*.
 b) kiel adjekton esprimantan la manieron, kaŭzon, koncedon, kondiĉon aŭ supozon, kaj karakterizitan per la finaĵo *-e*: *promenante sur la strato mi falis²; forlasite de sia edzo, ŝi tamen estis feliĉa* (Kp. §§ 99 Rim. II, 158 kaj 183 II).

Rim. I. Nur en tiuj supraj kvin okazoj, la participo alprenas la finaĵon *-e*.

Rim. II. La celon oni ne esprimas per participo (*mi venis faronte tion*), sed per infinitivo kun **por**: *mi venis por fari...*

2. kun adjektiva valoro, kiel epiteton. Dum la infinitivo ne plene samigas kun la substantivo, la participo akiras tiam ĉiujn karakterojn de la adjektivo: la sola diferenco kuŝas en la signifo: la participo montras ĉiam pli-malpli longan, sed nature momentan agon, dum la adjektivo el la sama radiko montras konsistigan econ: *ĉarma junulino – ĉies orelojn ĉarmanta kanto*.

Rilate al la esprimo de la tempo, oni devas noti, ke la pasiva participo, uzata izole, ne havas ĝuste ĉiam la samajn signifojn, kiel ĉe malsimplaj tempoj; nome, la **p r e t e r i t a** formo montras ĉiam klare finitan, ne plu daŭrantan agon, eĉ ĉe verbo de daŭro sen rezulto: *amita virino* (= ne plu amata virino), dum *ŝi estas amita de mi* estas neniam uzata formo (vd. § 110). Jen kelkaj klaraj ekzemploj: *mono havata estas pli grava ol mono havita²; la nomo de la homo amita kaj perdita²*, (dum oni dirus: *mono, kiu estas havata, estas pli grava ol mono, kiu estis havata; la nomo de la homo, kiu estis amata kaj perdita*).

Ĉe la **p r e z e n c a** formo oni ne vidas diferencon; ĝi estas uzata por esprimi nuntempon, sed preskaŭ ĉiam, precipe ĉe verboj de daŭro kun rezulto, ĝi esprimas ideon de daŭro aŭ ripetado: *ni bataladu, kune tenataj per unu bela espero²; la lingvaj eraroj farataj de la maljunulino, ne aperigis rideton²* (= kiujn ŝi faradis); *sur la freŝa buŝo aperadis petola rideto, kvankam tuj forigata, tamen sufiĉe montranta...*² (kvankam ŝi forigadis ĝin).

Tiun formon oni ne uzas ĝenerale kun verboj de rezulto sen daŭro krom por montri ripetadon.

La *f u t u r a* formo estas uzata kun la sama signifo, kiel ĉe la malsimplaj tempoj: *leteroj, ankoraŭ skribotaj, ne povas esti jam responditaj.*

Rim. III. El la participoj oni povas ĉiam derivi substantivon. Tiu substantivo regule montras personon, ne beston nek aĵon: *homo, kiun oni devas juĝi estas juĝoto^z; ne ĉiu bojato (= homo) estas ŝtelisto^z; falinton (= homon) ĉiu atakas^z; pendonto ne dronos^z; venkiton oni ne batas^z; memoru vian Kreinton en la tagoj de via juneco^z.*

Tamen oni trovas *estanto, estinto, estonto* por signifi tempojn, ne homojn, kvankam Z. (en la Lingvaj Respondoj, n-ro 114) nete diris, ke nur *estanteco* ktp. estas ĝustaj; sed li allasas ankaŭ por la participsubstantivo la signifon de "objekto, kiu plenumas iun funkcion"; tiel klariĝas, ke en la teknika lingvo oni trovas *adiciato, subtrahato, multiplikanto, multiplikato, dividanto, dividato, potenciganto* ktp. por montri ciferojn.

UZADO DE LA VOĈOJ

A. — Aktiva voĉo

119

Ĉe la aktiva voĉo, ni devas distingi tri kategoriojn da verboj:

1. tiujn, kiuj esprimas la ideon pri agado: *ami, bati, pensi* ktp. Tio estas la *ag-verboj*.

2. tiujn, kiuj esprimas la ideon pri stato, estmaniero: *sani, sidi, taŭgi* ktp. Tio estas la *stat-verboj*.

3. tiujn, kiuj esprimas rilaton inter ulo aŭ aĵo kaj al ĝi apartenanta kvalito, kaj havas, kiel propran signifon, nur la naturon de tiu rilato: *esti, aspekti, ŝajni, troviĝi* ktp. Tio estas la *kopuloj*.

La diferenco inter tiuj tri kategorioj ne estas absolute strikta; verboj, kiel *resti, ŝvebi* povas esti rigardataj kiel ag-verboj, se oni konsideras en ili la elspezitan penon, kiel en: *malgraŭ ĉiaj atakoj li restis sur siaj pozicioj*, aŭ: *por ŝvebi la birdo restarigas ĉiumomente la ekvilibron de sia korpo*; sed se oni konsideras nur la rezultantan senmovecon, oni klasos ilin inter la stat-verboj, kiel en: *li foriras, kaj mi restas*, aŭ: *la nizo ŝvebadis alte en la ĉielo*; kaj eĉ *resti* povas fariĝi simple kopulo en: *ĝibulo ĝis morto restos ĝibulo^z*. Tamen pri tre multaj verboj, oni ne havas heziton pri ilia klasado: ekz-e *ŝteli* neniam estas stat-verbo, nek *kuŝi* estas ag-verbo. Kaj tio sufiĉas por pravigi la ĉi-supran klasadon.

Inter la ag-verboj, oni devas fari alian distingon. Nome el la agoj, iuj celas, atingas, concernas personon aŭ aferon, kiun oni devas nomi, se oni volas precizigi la sencon de la frazo; ekz-e *ŝteli, bati* ktp. supozigas ĉiam, ke iu ricevas la batojn, suferas la ŝtelon ktp. Tiujn ag-verbojn oni nomas *transitivaj*, ĉar ili "transirigas" la agon sur iun aŭ ion (kp. § 176, 177). Aliaj estas, male, direktitaj kontraŭ neniu aŭ nenio; ekz-e: *spruci, ekstarti, tinti, evolui*, ktp. ne celas personon aŭ aferon, kiu estus modifita de ili. Tiujn ag-verbojn oni nomas *netransitivaj*.

La diferenco inter tiuj du subkategorioj estas tre grava en Esperanto,

ĉar, kontraŭe al multaj lingvoj, unu verbo ne povas esti samtempe transitiva kaj netransitiva, konservante la saman sencon; transitiva verbo povas netransitivigi nur helpe de sufiksoido (*ig*); kaj same nur helpe de afikso (*ig, um, pri*) povas transitivigi netransitiva verbo. Tiel klariĝas la uzado de: *bani-banigi, fini-finigi, komenci-komenciĝi, ŝanĝi-ŝanĝigi*, kaj aliflanke de *bruli-bruligi, halti-haltigi, kuŝi-kuŝigi, promeni-promenigi, pleni-plenumi, pendi-pendumi, plori-priplori* ktp.

Rim. I. Sola escepto estas *f u m i* (*la cigaro fumas: mi fumas la cigaron*).

Rim. II. Kelkaj netransitivaj verboj povas havi objekton konsistantan en ag-substantivo farita el la sama radiko: *dormi profundan dormon, vivi mizeran vivon, lukti malesperan lukton, juri grandan furon* ktp. Tiun dirmanieron oni nomas etimologia figuro.

Fine oni devas atenti, ke la transitivaj verboj povas esti uzataj sen komplemento, se oni volas insisti nur pri la ideo de la ago: *virino scias, tuta mondo scias*^Z; *konfidu, sed vidu*^Z. Oni diras tiam, ke la verbo estas uzata "a b s o l u t e". Kp. § 177 Rim.

B. — Pasiva voĉo

La pasiva voĉo estas tia maniero prezenti la agon, ke oni uzas subjekte la trafatan, celitan objekton kaj, se necese, esprimas la aganton per adjekto. Sekve de tiu difino, en la pasiva voĉo povas uziĝi nur ag-verboj. Oni povas paroli pri *amata* virino, sed ne pri *kuŝata* aŭ *ŝidata* virino.

Sed oni devas atenti, ke la difino de la transitiveco (vd. ĉi-supre, sub A.) estas multe pli vasta ol ĉe iu ajn nacilingvo: ĉiufoje, kiam verbo postulas vorton, por ke ĝia signifo mem estu determinita, oni povas uzi ĝin pasive: *iri, dormi* estas kutime netransitivaj; sed oni povas determini, limigi ties signifojn, dirante: *iri longan vojon*^Z; *dormi ŝtonan dormon*^B; do oni ankaŭ povas diri ĉe la pasivo: *plena konscio pri la irota vojo*^Z; *la dormita dormo*; *la plej malfacila parto de la vojo estas jam pasita*^Z.

Tamen, plejofte, al tiuj netransitivaj verboj, oni antaŭmetas prefikson, por pli bone klarigi la signifon ĉe la pasivo: *kiam la celo estos alvenita*^Z; *la nokto estis trankvile tradormita*; *unu kampo estis pripluvata*^Z.

Resume, la sola limigo, kiun Z. metis al la pasivigo de la verbo estas klareco: "eĉ de vortoj, kiuj per si mem ne postulas la akuzativon, vi povas en nia lingvo libere ĉiam fari pasivon, se nur la senco de tiu pasivo estos komprenebla".

Rim. El tiu tre larĝa uzo de l' pasivo rezultas, ke oni ne devas konkludi el la pasiva formo la eblecon uzi transitive la aktivan respondan formon; fakte, en la pasiva participa formo, la sufikso *at/it* klare montras, ke oni supoze aldonas al la radiko transitivan signifon; sed, se oni forprenas tiun sufikson, nenio ĉe la aktiva formo montras plu tiun transitivecon, kaj oni estos devigata anstataŭigi la partizan (pasivan) sufikson per transitiva afikso. Ekz-e, el vortgrupo kiel "lumitaj fenestroj"^Z, oni ne povas konkludi, ke Z. donis al *lumi* transitivan signifon, kaj diri: "lumi ĉambrom"; male, *lumi* estas netransitiva (la ĉielo lumas = estas luma), kaj por montri la transitivecon oni devas aldoni taŭgan afikson: *prilumi* aŭ *lumigi*.

Same pri "kavita trunko" z kontraŭe al *kavigi teron*. (Vd. § 351, Rim. III).

Alivorte oni povas diri, ke neofte, ĉe la pasivo, la transitivigaj afiksoj pri aŭ ig estas forlasitaj antaŭ la pasiva sufikso it (aŭ at), ĉar tiu ĉi sola sufiĉas por montri, ke al la primitiva radiko oni donas transitivan signifon.

La pasiva voĉo estas precipe uzata en nepersona maniero, kiam la ideo pri la ago estas pli grava ol tiu pri la aganto: *estas malpermesite fumi tie ĉi!* De tio venas ĝia uzado en la administracia stilo, kie oni volonte evitas la respondecojn. En la ordinara stilo, oni prefere uzas la aktivan (kun subjekto *oni*, se oni ne volas precizigi la subjekton) aŭ la medialvoĉan formon (*-ig*), kies senco estas sufiĉe proksima: *la artikolo uzigas en la sekvantaj okazoj*. Kvankam Z. neniam uzis tiun formon, ĝi pli kaj pli disvastiĝas. Tamen frazo kiel: *mi nomigas Petro* ŝajnas ankoraŭ stranga.

C. – Faktitiva voĉo

La fundamenta senco de la faktitivo estas: *fari, ke iu aŭ io faru aŭ suferu agon*. En la faktitivo do troviĝas du agoj: la ago *kaŭzanta* kaj la ago *kaŭzata*.

La ago *kaŭzanta* estas esprimita per *igi*. Tiu *igi* povas esti sufiksoido, kaj ĝi povas esti memstara (vd. § 103); oni do devas aparte paroli pri la *sinteza* formo (ekz-e: *kaptigi*) kaj pri la *analiza* (ekz-e: *igi kapti*). Krome, ĉi tie ni povas paroli ankaŭ pri *lasi*, kiu estas iel surrogato de la faktitiva voĉo.

1. *Sinteza formo*. Ni vidos (§ 351. 3. a-d.), ke la *kaŭzata* ago povas esti aktiva (*dormigi: igi dormanta*) kaj pasiva (*konstruigi: igi konstruata*). Ĉe netransitivaj verboj, kompreneble, ĝi povas esti nur aktiva; ĉe la transitivaj, ĝenerale, ĝi estas pasiva. Tamen ekzistas esceptoj (vd. § 351.3.c-d).

Ĉar ĉe la *sinteza* formo la ĉefelemento estas *igi*, la ĉefan senco de la vorto portas tiu ĉi *igi*. Ĝi difinas do la sintaksan funkcion de la verbo. El tio sekvas:

a) ke la refleksivo resendas ne al la subjekto de la *kaŭzata* ago, sed al la subjekto de *igi*: *ili lernigis si a n langon paroli malveron*² (vd. § 161, A., Rim. II).

b) ke la subjekto de la *kaŭzata* ago neniam povas esti esprimita per agant-adjekto (*de*). Tio estas evidenta, se oni uzas faktitiv-pasivon; ekz-e, se Petro konstruis domon laŭ la komisiono de Paŭlo, la domo *konstruita de Petro* estis *konstruigita de Paŭlo*; estas klare, ke "konstruigita de Petro" ne povas esprimi, ke la domon konstruis Petro. Same malĝuste estus do en aktivo: *Paŭlo konstruigis de Petro domon*.

La subjekton de la *kaŭzata* ago do oni devas esprimi alimaniere:

aa) se la *kaŭzata* ago estas aktiva, ties subjekto iĝas la rekta objekto de la faktitivo: *li atentigis ŝin*.

bb) se la *kaŭzata* ago estas pasiva, kaj ties subjekto, per la tuta faktitiva ago, ricevas ian profiton aŭ malprofiton, spiritan, materian, korpan, oni uzas al: *li sentigis al vi sian skurĝon*². Tiaj verboj estas ekz-e: vidigi,

aŭdigi, sentigi, konigi, sciigi, lernigi, glutigi, manĝigi, trinkigi, havigi, heredigi, akirigi, perdigi, evitigi al iu (= igi vidata, aŭdata, sentata *de* iu). La uzon de al ĉi-okaze komprenigas, se oni anstataŭigas la suprajn faktitivajn verbojn per simplaj verboj havantaj similan sencon: *vidigi* (= *montri*) al iu; *lernigi* (= *instrui*) al iu.

cc) se la subjekto de la kaŭzata ago ne profitas aŭ malprofitas mem el la ago faktitiva, ĝi povas esti rigardata kiel simpla instrumento de la kaŭzanta ago; do oni povas uzi **per**: *la domo estis konstruigita de Paŭlo per Petro*; *amuzigi la gastojn per aktoroj*; *pentrigi sian bildon per fama artisto*. La uzon de **per** ĉi-okaze komprenigas, se oni anstataŭigas la faktitivan verbon per simpla verbo havanta similan sencon: *portigi* (= *sendi*) *leteron per servisto*; kiel ĉi tie iu *sendis*, la servisto *portis* la leteron, same, en la supra lasta ekzemplo iu *pentrigis*, la pentristo *pentris* la portreton.

Rim. I. La faktitivoj montritaj sub bb) povas havi kroman **per**-adjekton: *havigi al si la libron per agente*; *sciigi al iu per sendito*. Tie ĉi *havigi* kaj *sciigi* signifas propre *havigigi* kaj *sciigigi*.

Kontraŭe, la faktitivoj montritaj sub cc) povas havi kroman **al**-adjekton: *pagigi al iu monon per banko*; *li konstruigis al sia amatino belan domon per fama arkitekto*; *li skribigis al mi per sia sekretario*.

Kaj, almenaŭ teorie, ili povas havi ankaŭ kroman **per**-adjekton, kiu signas la instrumenton uzatan de la subjekto de la kaŭzata ago. Tiaokaze oni povas uzi **kun**: *ŝi kombigis al si la harojn per servistino kun ora kombilo* (t.e. kombistino kun ora kombilo estis, kiu ŝin kombis: oni esprimas nur, ke la servistino *havis* orkombilon; ke ŝi ĝin ankaŭ uzis, tio estas evidenta el la teksto.)

Rim. II. Z. ordinarie evitas **per**-adjektojn apud faktitivo, verŝajne pro la iom algebra komplikeco de la esprimmaniero. Sed kelkfoje ili estas apenaŭ eviteblaj. Ekze la frazon: *per kiu vi konstruigos vian domon?* malfacile estus esprimi pli simple. Tial oni trovas, ĉe Z., ekzemplojn kiel: *Kion la magistrato anoncigas al mi per vi?*

Rim. III. Ĉe la igi-verboj, kiuj povas signifi same *igi-anta* kiel *igi-ata*, oni povas konservi la partician elementon por pli preciza distingo. Ekzemple: *manĝantigi* ĉevalon, *manĝatigi* ĉevalon; *konantigi* iun pri io, *konatigi* iun al iu. Tio tamen okazas nur escepte; nur la formon *konatigi* oni renkontas ofte. Kelkfoje oni uzas la partician elementon por signi la tempon. Ekzemple: *okazontigi aferon*; *sin devontigi pagi grandajn sumojn*. Sed ankaŭ tio estas malofta.

2. *Analiza formo.* La memstaran **igi** tuj sekvas la subjekto de la kaŭzata ago, en akuzativo, poste sekvas la verbo de la kaŭzata ago, en infinitivo, kaj fine la objekto de la kaŭzata ago: *li igis lin legi la libron*. (Vd. § 233, Rim. II kaj III).

Ĉe la analiza formo, la kaŭzata ago ĝenerale estas aktiva. Tial, kiam la sinteza formo estas uzata nur kun pasiva senco de la kaŭzata ago (vd. § 3. a.), oni uzas la analizan formon por signi ties aktivan sencon: *konstruigi (domon) – igi* (arkitekton) *konstrui*. Male, oni ne uzas ĝin, kiam ankaŭ la sinteza formo signas aktivan agon kaŭzatan: oni ne diras *igi stari*, sed simple *starigi*.

Tamen, oni povas signi per la analiza formo ankaŭ pasivsencan kaŭzatan agon. Tio okazas, kiam la sinteza **igi** devas ligiĝi al **igi**-kunmetoj: *li igis*

purigi la veston; li igis pintigi la krajonon.

Rim. IV. Kiel ni vidis, la subjekto de la kaŭzata ago, ĉe la analiza formo, staras tuj post la verbo *igi*. Tio povus doni rimedon por distingi inter la aktivsenca kaj pasivsenca kaŭzata ago en tiaj okazoj: *li igis la soldatojn mortigi* (la soldatoj mortigis) – *li igis mortigi la soldatojn* (la soldatoj estis mortigitaj). Same: *li igis la ĉevalon manĝi* (manĝanta) – *li igis manĝi la ĉevalon* (manĝata). Nome, en tiaj okazoj post *igi* oni povus subkompreni la mankantan subjekton de la aktivsenca kaŭzata ago: *li igis (onin) manĝi la ĉevalon*. Sed tia distingo, kvankam eble utila en kelkaj okazoj, ne estas farata.

3. *Lasi*. Ĝi estas analogaj al la memstara *igi*. Sed inter ili estas klaraj diferencoj:

a) Dum la senco de *igi* estas *fari* (ke iu faru), *lasi* signifas: *ne malhelpi* (ke iu faru): *ŝi lasis lin foriri* (ne malhelpis, ke li foriru). Oni do ne uzu *lasi* anstataŭ *igi*; tiaj ekzemploj de *Z.* devenas eble de lia malinklino al la memstara *igi*: *li lasis (igis) poluri sian kronon*.

b) La ne malhelpata ago povas esti pasivsenca tute simile al la kaŭzata ago ĉe *igi*, sed nur, se ĝia subjekto identas kun tiu de *lasi*; ekz-e: *ŝi lasis sin trompi* (esti trompata). Se ne, ĝi estas aktivsenca: *ŝi lasis lin trompi* (ke li trompu). Kp. § 155. Rim. II.

Rim. V. Ankaŭ ĉi tie, kiel ĉe *igi*, oni povus subkompreni la aganton de la aktivsenca ne malhelpata ago, en formo de la objekto de *lasi*, kiam la verbo de la ne malhelpata ago staras tuj post *lasi*; do: *ŝi lasis (iun) trompi lin*. Sed ŝajne tia distingo per vortordo estas fremda al Esp-o.

Lasi povas havi ankaŭ adjektivan predikativon; tiaokaze ĝia senco estas: *ne igi ne-*; ekz-e: *lasi ion malplena* (ne igi ne-malplena); *lasi postenon neokupita* (ne igi okupita).

Rim. VI. La senco de *lasi* sen predikativo, estas: a) ne tuŝi: *lasu tiun aferon*; b) restigi: *mi lasis la libron sur la tablo*.

La kvar sencoj de *lasi* alternas en la prefiksoid-kunmetoj: *allasi* (permesi, akcepti); *delasi* (ne plu teni, lasi foriri); *ellasi* (lasi eliĝi; forrestigi, ne signi, ne mencii); *enlasi* (lasi eniri); *forlasi* (lasi, restigi sola forirante); *postlasi* (restigi post si); *preterlasi* (lasi netuŝita preterpasante); *tralasi* (lasi trairi); *translasi* (lasi transpreni). Kiel oni vidas, *lasi* estas eĉ pli "elasta verbo" ol *meti*.

Rim. VII. En la senco *restigi* oni uzu *lasi* nur, se en la frazo ekzistas loka aŭ stata adjekto: *lasi ion en ĉambro, sur tablo*; *lasi iun sen helpo* ktp. Cetere oni uzu prefiksoidon (forlasi, delasi); oni do ne diru: *li lasis ŝin*, ĉar tio ne havas kompletan sencan.

D. – Mediala voĉo

La mediala voĉo, esprimata per *igi*, unuigas en si propre la aktivon kaj la pasivon: la subjekto estas samtempe ankaŭ la objekto de la ago: ĝi faras la agon pri si mem. Tial mediala verbo ankaŭ ne povas havi kroman objekton, ĝi estas en si mem netransitiva. Do ĝi ne povas havi pasivon (vd. § 104, Rim. II).

Ĉar la objekto de la mediala voĉo estas ties subjekto mem, la mediala voĉo estas iom parenca al la aktivo kun refleksivo, kiun oni povas nomi *r e f l e k s i v a v o ĉ o*: *sin ruli, sin vesti, sin turni*. La diferenco inter la du formoj estas, ke la refleksiva voĉo esprimas agon faratan vole, konscie, dum la medialo esprimas agon faratan sen decido de konscia volo: *li fetis sin vizaĝaltere^Z (vole); li iom jetiĝis malantaŭen^Z (nevole); akre desegniĝas la konturo de domo; la pentristo desegnas sin; la ŝtono ruliĝas; la knabo rulas sin sur la tapiŝo*; kelkfoje, tamen, tiu diferenco ne estas atentata; unuflanke oni diras: *okupiĝi* (sin okupi), *li turniĝis* (turnis sin); *li volviĝis* (volvis sin) *en sian mantelon*; aliflanke oni trovas: *tie sin trovas* (troviĝas) *multaj birdoj*; *la tero turnas sin* (turniĝas) *ĉirkaŭ la suno*. Tiuj formoj, eĉ se ne strikte logikaj, estas pardoneblaj, ĉar kutimaj.

La diferenco inter la pasiva kaj mediala voĉoj estas, ke la pasivo, kvankam ĝi tiras la atenton pli al la ago ol al la aganto, tamen subkomprenigas aganton, esprimitan aŭ ne per agant-adjekto: *la ŝtono estas rulata* (de iu); male, ĉe la mediala voĉo la gramatika subjekto kaj la aganto estas identaj, do kroma aganto ne estas subkomprenata: *la ŝtono ruliĝas* (per si mem). Tial do la mediala voĉo estas uzata por esprimi netraktivan agon per verboj radike transitivaj (ekzemplojn vd. § 352. 3.).

El ĉi tio sekvas:

a) ke oni ne uzu la medialan voĉon anstataŭ pasivo, kiam aganto devas esti subkomprenata; oni do ne diru: *li laŭdiĝas*, ĉar aŭ *li laŭdas sin* (vole), aŭ *li estas laŭdata* (de iu). Same malĝuste estas: *la letero skribiĝas, la bildo pentriĝas* ktp. Kelkfoje tamen estas uzata tia formo por esprimi nuancon: *la libro legiĝas facile*: tiel facile, ke ĝi kvazaŭ legas sin mem kaj la leganto devas nur rigardi.

b) ke oni ne uzu pasivon anstataŭ mediala voĉo, kiam aganto ne povas esti subkomprenata: *la ŝtono ruliĝas sur la deklivo malsupren* (estas rulata subkomprenigus, ke iu rulas ĝin).

c) ke la komplemento de la medialaj verboj estas ne agant-adjekto, sed *instrument-adjekto* kaj tiel ĝi estas enkondukita per *per*: *ne ĉiam per aĝo mezuriĝas saĝo^Z; la adjektivo finiĝas per -a^Z; mi benos viajn benantojn... kaj beniĝos per vi ĉiuj gentoj de la tero^Z* (latine: *in te benedicentur*); aŭ *kaŭzadjekto* enkondukita per *de* (vd. § 206, A. d.).

LA PREPOZICIOJ

120

La plejparto el la prepozicioj estis liverita de la elpensinto de la lingvo: ili staras sub plej diversaj formoj, el kiuj kelkaj eĉ ne estas konformaj al la fonetiko de la lingvo, laŭ kiu vortoj ordinaraj ne finiĝas per voĉa konsonanto: *apud, sub* (tria escepto estas la konjunkcio *sed*); pluraj tamen akceptis komunan finon *-aŭ*, kiun ni jam vidis ĉe la adverboj: *antaŭ, anstataŭ, ĉirkaŭ, kontraŭ, laŭ, malgraŭ*. (Kp. § 89).

Oni havas la sekvantajn prepoziciojn en E-o: *al, anstataŭ, antaŭ, apud, ĉe, ĉirkaŭ, da, de, dum, ekster, el, en, ĝis, inter, je, kontraŭ, krom, kun, laŭ, malgraŭ, per, po, por, post, preter, pri, pro, sen, sub, super, sur, tra, trans*.

Rim. I. Ĉar en la unuaj tempoj de la lingvo Z. ankoraŭ ne enkondukis la prepozicion *krom*, ties rolon ludis la prepozicio *ekster*.

Al kelkaj prepozicioj oni almetis prefikson, por pliprecizigi ilian signifon. Ĉar *antaŭ* kaj *post* servas por la loko kaj por la tempo, oni montras nur la lokon per *malantaŭ*, kaj pli kaj pli validiĝas la tendenco uzi *post* nur tempe. Sed oni ne havas nur tempan *antaŭ* (*malpost* estus tro artefarita, *pre* ne trovis aplikantojn), tial en okazo de neceso oni esprimas ĝin per *antaŭ ol*: *mi venos antaŭ ol vi*; aŭ per *jam antaŭ*: *li faris tiun paroladon jam antaŭ la kongreso* ("li jam faris" povus signifi, ke li parolis antaŭ la kongreso jam ankaŭ alifoje). Oni ne havas prepozicion por esprimi la malon de *trans*. Kelkaj uzis *maltrans*, sed tiu vorto estas tro artefarita; eble ne estas senŝanca *cis* en tiu senco. Por distingi kelkajn el la multaj signifoj de *de*, oni uzas *ekde* (de la komenco de...), *disde*, *el de* (por esprimi demovon), *fare de* aŭ *far' de* (por esprimi la agant-suplementon); estas provata eĉ la senfinaĵa *far*. Por eviti la pezon de *anstataŭ*, estis proponita *vic' al*.

Ni ne klarigas ĉi tie la signifojn de ĉiuj supraj prepozicioj: tio estas ja la tasko de vortaro; en la "Plena Ilustrita Vortaro" oni trovas detale eksplikitan la uzadon de la unuopaj prepozicioj. En tiu ĉi libro, ni pri-traktas detale la rilatojn esprimatajn per ili, ĉe la suplementoj (§§ 133-150), ĉe la nerektaj objektoj (§ 179), kaj ĉe la adjektoj (§§ 183-213). Cetere, ankaŭ la diversajn sencojn de la unuopaj prepozicioj oni povas facile trovi helpe de la Indekso.

La prepozicioj kompreneble neniam estas uzataj memstare. Ili funkcias dumaniere:

1. ili enkondukas substantivon, formante kun ĝi *prepozitivon*:

Rim. II. En kelkaj okazoj la prepozicioj enkondukas adverbos: *por ĉiam^z; vi faris Izrael vian popolon por eterne^z; ĝis ĉi tie aliru^z; ĝis morgaŭ, ĝis baldaŭ; alporti ion de malproksime^z; rigardi iun de alte^z; de eterne, de supre^z; de apude*. Kiel oni vidas, temas nur pri adverboj signantaj pozicion en la spaco aŭ en la tempo, kaj tiel ludantaj rolon de kvazaŭ-substantivoj. Kelkaj prepozicioj (vd. § 117 dd) povas enkonduki infinitivon: *li faras nenion krom manĝi kaj dormi*.

2. ili alprenas la e-finaĵon, formante kun ĝi prepozician *adverbon* (vd. § 296 C.).

Pli detale ni devas okupiĝi pri la prepozitivoj kaj prepoziciaĵoj.

Prepozitivoj

121

La prepozitivojn oni povas dividi laŭ la kazo de la regata substantivo.

1. *Nominativ-prepozitivo* (unu prepozicio plus unu substantivo): *sur la monto*. Tio estas la plej ofta kaj plej simpla okazo. Ĉiu prepozicio postulas post si per si mem ĉiam nominativon.

2. *Prepozitiv-prepozitivo* (unu prepozicio plus unu prepozitivo): *el sub la lito*. Tie ĉi do du prepozicioj staras unu apud la alia; la dua formas prepozitivon kun la substantivo, la unua rilatas al tiu prepozitivo kiel al unu tuto. La prepozitivo montras pozicion aŭ tempopunkton kaj la unua prepozicio montras demovon, almovon aŭ tramovon rilate al tiuj. Tiaj prepozitivoj estas: *de antaŭ, de ĉe, de inter, de super, de sub, el antaŭ, el inter, el sub, el trans, ĝis en, ĝis super, tra inter* (lokaj); *de post, de antaŭ, ĝis post, ĝis antaŭ* (tempaj). Ekzemplojn vd. §§ 191-192 kaj 194-195.

3. *Akuzativ-prepozitivo*. La akuzativo montras almovon, do anstataŭas almovan prepozicion (*sub la lito* = *al (ĝis) sub la lito*). Vd. §§ 191-192. Escepton vd. § 87 A.

Krom tiu laŭkaza divido oni povas distingi ankoraŭ:

4. *Duopajn prepozitivojn*, t.e. du prepozitivojn interligitajn: *de rando al rando, kun glavo en la mano, kun la kapo al tero*. Vd. § 185. Al ili iom similas la duopo prepozicio+konjunkcio *inter... kaj... : inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi^z*.

5. *Interpozitivojn*, t.e. du substantivojn interligitajn per prepozicio kaj rigardatajn kiel adverbo: *paŝo post paŝo*. Vd. § 185.

La prepozitivoj funkcias aŭ kiel adjektoj, aŭ kiel suplementoj.

Prepoziciaĵoj

122

Prepozicio povas rilatigi la sencon de adverbo al substantivo. Tiu adverbo do kun la prepozicio havas prepozician funkcion kaj estas nomata prepoziciaĵo. Tiaj prepoziciaĵoj estas en E-o:

la al-prepoziciaĵoj: *dank' al^z* (= danke al; sola ekzemplo de elizio de -e); *favore al, fronte al, honore al, kompanse al, konforme al^z, konsidere al,*

prepare al, proksime al, proporcio al, renkonte al, responde al, rilate al, spite al, vidalvide al.

la **de**-prepoziciaĵoj: *aparte de, ĉirkaŭe de^Z, daŭre de, dekstre de, maldekstre de, depende de, detempe de^Z, ekskluzive de, escepte de, fare de, fine de, flanke de, funde de, helpe de, inkluzive de, interne de, kaŭze de^Z, komence de, komisio de, kondiĉe de, konsekvence de, kontraŭe de, kontraŭvizaĝe de, laŭlarĝe de, laŭlonge de, manke de, memore de, meze de^Z, najbare de, nome de, norde (sude, oriente, okcidente) de, okaze de, malproksime de^Z, rezerve de, rezulte de^Z, sekve de, transe de^Z.*
 la **kun**-prepoziciaĵoj: *kompare kun^Z, konforme kun, interkonsente kun, interrilate kun, kontraste kun^Z, kune kun, nivele kun, paralele kun, proporcio kun.*

Rim. Kiam la adverbo devenas de verba radiko, oni povas post ĝi anstataŭigi la prepozicion per akuzativo: *danke vian oferon; responde vian leteron*; ktp. Tio estas eĉ la plej ofta konstruo post: *k o n c e r n e* (*ili sidis, plenkreskuloj kaj tamen infanoj koncerne sian koron^Z*); *r i l a t e* (*kiel li povas esti tiel blinda rilate sin mem?^Z*). Pri *s p i t e* vd. § 92, Rim. VI.

LA KONJUNKCIOJ

La konjunkcioj de Esp-o konsistas el origine liveritaj vortoj: *aŭ, ĉar, do, kaj, nek, nu, sed, tamen* — al kio oni povas aldoni la adverbojn *tiam, tial, tiel*, kaj la subjunkcion *dum* (vd. § 223). Apud tiuj vortoj, oni uzas multajn adverbojn, kiuj havas funkcion pli malpli proksiman al tiu de konjunkcio: *alie, cetere, dume, fine, krome, male, malgraŭe, poste, same, nome, pruve, sekve*, ktp.

Aparte oni devas noti la duopajn konjunkciojn: *jen... jen...; aŭ... aŭ...; ĉu... ĉu...; ĉu... aŭ...; kaj... kaj...; nek... nek...; ne nur... sed ankaŭ...; kaj la adverbojn: unuflanke... duaflanke^Z...; unupartite... alipartite...; unutempe... alitempe... ktp.*

Uzado

Malmulto estas rimarkinda.

Ĉu neniam povas esti uzata izole kun la signifo de *aŭ*, sed oni devas uzi ĝin ripete. Cetere ĝi povas enkonduki jen du paralelajn adjektojn, jen du paralelajn propoziciojn: *ĉu pro timo, ĉu pro fiereco, li nenion respondis; ĉiuj anasoj, ĉu ili kuŝis sur la akvo, ĉu ili staris sur la kampo, per unu fojo ekkuris^Z*. Krome, ne estas konsilinde "uzi ĝin senbezone anstataŭ *jen... jen..., aŭ... aŭ...*"^Z, kiam ne estas ideo pri necerteco, dubo ktp. Ekzemple, ĉe la du frazoj: *ŝi kutimas havi ĉe ŝia zono ĉu rozon, ĉu diamanton kaj diru tion ĉu al la kapitano, ĉu al la leŭtenanto, Z. preferis uzi jen... jen... en la unua, kaj en la dua aŭ... aŭ... Ĉiel frazo, kiel: li volas aĉeti ĉevalon ĉu azenon*, estas krude malkorekta. Vd. § 222, Rim. IV, kaj 258, lasta alineo.

Des (pli) regule korelativas kun *ju* (pli) por esprimi paralelan komparan variadon: *ju laboro pli publika, des pli granda la kritiko^Z; ju pli li atentat, des malpli li komprenas*. Sed estas okazoj, en kiuj oni esprimas nur la konsekvencon (*des*) kaj ne la kaŭzon (*ju*). En tiaj okazoj, estus pli korekte uzi *tiom* (pli) anstataŭ *des* (pli): *eĉ por sturno estas utile ion lerni, tiom pli multe por homo^B*. Tamen, pro analogio kaj klarsoneco, *Z.* regule uzas *des* en tiaj okazoj: *la silentema submajstro, kiu malmulte parolis, sed des pli multe laboris^Z*. Aliflanke, li uzas la formon *pli* eĉ kiam tiu adverbo rilatas ne al aparta vorto, sed al la ideo de la tuta

propozicio, kaj fariĝas kvazaŭ konjunkcio: *plej fortaj incensoj, kiuj eĉ al anĝelo farus kapturnon, des pli al simpla poeto^Z; mi neniam havis la feliĉon veni en manĝoĉambron, des malpli en manĝafejon^Z* (temas pri muso).

Rim. I. Inverse oni ne uzu **tiom pli** korelative kun **ju pli**, kiel iam faris Z.

Pri des pli ke vd. § 225 kaj 252, 3.

Do montras ĉefe konkludan ligitecon, kaj troviĝas ordinare post la verbo: *vi vidas do, diris Evelino, ke vi ne devas kulpigi min^Z; mi devas do decidiĝi, ĉar vi tiel volas^Z*. Sed ĝi estas ankaŭ uzata por insisto ĉe ordo, aŭ por emfazo ĉe demando: *ha, ĉesu do fari ŝercojn!^Z per kio do mi povas servi al vi?^Z* Vd. §§ 217 kaj 224.

Kaj ne devas esti uzata, kiel en kelkaj lingvoj, por ligi rilatan subpropozicion al antaŭa participo aŭ eĉ adjektivo; frazkonstruo kiel: *"mona sistemo bazita sur duobla normo kaj en kiu la rilato inter oro kaj arĝento estas precize fiksita"* estas evitinda: oni uzu aŭ ambaŭokaze participojn (... *bazita sur... kaj precize fiksanta...*), aŭ ambaŭokaze subpropoziciojn (*mona sistemo, kiu estas bazita sur..., kaj en kiu...*).

Kaj... kaj... montras pli insistan kunligon de du aferoj, ol la simpla **kaj**: *mi volas aĉeti kaj la robon kaj la ĉapelon* (nepre ilin ambaŭ!); *sed al tiu bona knabo ni alportos kaj frateton kaj fratineton^Z* (ne nur frateton, sed ankaŭ fratineton); *kaj ilia amo, kaj ilia malamo, kaj ilia ĵaluzo jam de longe malaperis^Z* (ĉiuj iliaj memorajoj kune).

Nek estas ĉefe uzata korelative kun alia **nek**: *restas nek konsilo nek konsolo^Z*. Oni povas uzi ĝin ankaŭ por ligi du proponojn, kiam en la unua enestas negacio (*ne, neniu* ktp.): *ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro^Z; nenia peno nek provo donos lakton de bovo^Z; mi ne renkontis lin, nek lian fraton^Z; la infanoj ne povis tion aŭdi nek kompreni^Z; mi ne vidis lin iam, nek ie; neniu anglo nek germano ĉeestis la prelegon*. Tamen oni ne uzas ĝin por ligi du vortojn, kiuj dependas de **sen**: *malsaĝuloj kreskas mem, sen plugo kaj sem^Z; strangaj kreskaĵoj sen tero kaj bazo^B*. Oni neniam povas uzi ĝin por ligi nean propozicion al antaŭa pozitiva: *estis varmege, nek unu arbitaĵo donis ombron, sed tian krudan malkorekton oni devas ĝustigi en: kaj eĉ ne unu arbitaĵo donis ombron*. Kp. § 85. Rim. III.

Sed neniam devas esti uzata korelative kun **kvankam**, kies korelativo estas ja **tamen**: *kvankam mi ofte uzis la formon "la ambaŭ", tamen mi opiniis nun, ke pli logike estas uzi la vorton "ambaŭ" sen artikolo^Z*.

Rim. II. La vortojn **plus** kaj **minus** kelkaj rigardas prepozicioj, analoge al **kun** kaj **sen**; ŝajnas pli ĝusta rigardi ilin konjunkcioj, analoge al **kaj** kaj... **"malkaj"**, sekve uzi eventuale post ili akuzativon: *ĉi tiuj heredos la domon plus la valorpaperojn, tiuj la moveblaĵojn minus la juvelojn*.

LA SUBJUNKCIOJ

124

La originaj **s u b j u n k c i o j** estas nur 7: *ĉar* (kaŭzo), *dum* (daŭro), *ĝis* (tempo-fino), *ke* (eksplikoj), *kvankam* (koncedo), *kvazaŭ* (fiktiva komparo), *se* (supozo). Pri ilia uzo serĉu en la Indekso.

Rim. I. *Dum* kaj *ĝis* funkcias ankaŭ kiel prepozicio; *ĉar* (klariga) kaj *dum* (adversa) ankaŭ kiel konjunkcio.

Krome, kiel subjunkcioj funkcias ankoraŭ:

a) **kiu, kio, kia, kies**, enkondukantaj rilatajn subpropoziciojn (ilin vd. en la Indekso).

b) **ĉu** kaj la demanda tabel-serio **kiu, kio, kia, kiel** ktp. enkondukantaj dependajn demandojn (vd. § 230, 3.).

c) **kie** enkondukanta lokajn subprop-ojn (vd. § 244).

d) **kiel, kiom** kaj **ol** enkondukantaj komparajn subprop-ojn (vd. § 262).

e) **kiam** enkondukanta tempajn subprop-ojn (vd. § 246).

f) **ol** en la du kunmetoj **antaŭ ol** kaj **post ol**, indikantaj tempon.

Sed same kiel ĉe la prepozicioj, oni sentis la bezonon disponi pri pli multaj subjunkcioj por esprimi ĉiujn pensuancojn, kaj oni ekuzis kombinitajn subjunkciojn. Oni trovas jenajn:

1. **ke** povas kombiniĝi kun antaŭmetitaj prepozitivaj laŭ la formulo *x tio, ke*, en kiu *x* povas esti ĉiu prepozicio en ne-loka aŭ ne-tempa senco: *anstataŭ tio, ke; krom tio, ke; malgraŭ tio, ke; per tio, ke; pri tio, ke* ktp. Preskaŭ ĉiam oni ellasas **tio** post **por** (*por ke*); ofte post **krom** (*krom ke*); **malgraŭ** (*malgraŭ ke*); malpli ofte post **anstataŭ** (*anstataŭ ke*) kaj **sen** (*sen ke*). Oni trovas ankoraŭ la prove uzatan **pro ke**, sed post la aliaj prepozicioj oni ĉiam metas **tio**, do *per ke, pri ke, de ke, el ke* ktp. ne estas uzataj. **Ke** povas kombiniĝi ankaŭ kun antaŭmetita adverbo: *tial ke, tiel ke, tiom ke, kondiĉe ke, konsidere ke, pretekste ke, spite ke, supoze ke...*

2. **se** povas kombiniĝi kun antaŭmetita prepozitivo: *krom tio, se* (aŭ *krom se*); *en okazo, se...*; kaj kun antaŭmetita adverbo: *escepte se, kiel se, eĉ se, nur se...*

Rim. II. Post **laŭ tio** oni uzas ĉu aŭ kiel. La uzo de **se**, kvankam montrita de kelkaj gramatikistoj (Grosjean-Maupin), ne estas rekomendinda. Vd. § 257 III.

3. **kiu** kaj **kio** en rilataj kaj demandaj subpropozicioj povas kombiniĝi kun ĉiu prepozicio: *kun kiu, de kiu, per kiu, por kiu, pro kio* ktp.

4. **kiam** povas kombiniĝi jene: *de kiam, ĝis kiam, antaŭ kiam, post kiam*. Anstataŭ **antaŭ kiam** oni uzas **antaŭ ol**, dum **post ol** estas nekutima, kvankam tute pravigebla.

5. **kiel** povas esti enkondukita per: *depende de tio, kiel²; konforme al tio, kiel²...*

LA INTERJEKCIOJ

125 Kiel ajn granda estas la graveco de la interjekcio en la parolo, ĝi, sub sia specifa formo, ne apartenas al la gramatika sistemo de la lingvo: interjekcioj propre konsistas el ekkrioj, kun pure emocia signifo: *ve! fi! ŝŝ! huŝ! hoj!*

Tamen, pro la ĝenerala interŝangebleco de la lingvaj elementoj, kelkaj el ili eniris en la lingvosistemon, ekz-e *fi!* uzata prefikse en *fihomo*, radike en *fia*; *ve!* uzata prefikse en *vekrii*, radike en *vea*, *vei*. Inverse, pluraj vortoj uziĝas kiel interjekcioj: *brave! vivu! dankon! pardonon!*

Rim. I. Tio estas aparte la kazo ĉe la sakroj (ludblasfemoj): *fulmotondro! blunderbluzo! mil diabloj! Dio damnu! korpo de Bakĥo!* La helenoj diris, kaj la francoj proksimume diras: *je la hundo!* Rossetti iniciatis: *al kukolo!*

Oni povas klasi la interjekciojn, laŭ tio, ĉu ili servas por alvoki, aŭ por forpeli, aŭ por instigi al ago, aŭ por esprimi senton.

Alvokaj interjekcioj

he!^Z la plej simpla, por altiri ies atenton: *he! kion vi havas en la sako?*^Z
he ho!^Z *hej ho!* pli vigla ol la antaŭa: *he ho! he ho! jen mi alvenas*^Z.

hola!^Z *ho he!*^Z *ho vi ho!*^Z por alvoki iun de malproksime, kaj: *uhu! hu ho hu!*^B por alvoki de tre malproksime.

hoj! ho hoj! marista alvoko: *ho hoj! de la boato!*

ts, ts!^Z por alvoki knabon, gazetvendiston ktp.: *ts! ts! knabeto! li vokis*^Z.

ha lo! por telefone alvoki, por altiri atenton de pasanto ktp.

Rim. II. La skribo per du vortoj ebligas konservi la akcenton sur la dua silabo; krome tio liveras alian bonan interjekcion, ĉar oni tute rajtas uzi, por altiri atenton, la substantivan formon de la artikolo **la**, kiu estas mem speco de demonstrativo: *lo! vidu, kion vi faraĉas!*

Forpelaj interjekcioj

for! la plej forta: *ne taŭgas, diris la reĝidino: for!*^Z

hot!^B; *hoto!*^Z por antaŭenirigi ĉevalon, forpeli bovon ktp.

huŝ!^Z *tju!*^Z por fortimigi beston (birdon, hundon ktp.).

Instigaj interjekcioj

baj... baj...! lu... lu...! por endormigi infanon, lulante ĝin.
bis!^Z por aprobi aktoron, kaj peti de li, ke li rekomencu brilan pecon, aŭ por indiki, ke oni ripetu refrenon post ĉiu strofo.
ĉit! ŝŝ!^Z *ts!*^Z por silentigi iun: *ŝŝ! diris ŝi metante la fingreton sur la buŝon*^B; *ts! ŝi venas! Lasu nin solaj!*^Z
ek! por ekirigi: *ek! al la bicikloj!*
halt!^Z por haltigi homon: *halt! La dogano!*
hej!^Z kuraĝiga alvoko.
help!^Z helpopetanta alvoko: *help! mi estas priŝtelita!*
hop!^Z por instigi al salto.
ho ruk! alvoko al kuna subita fortostreĉo: *la hakistoj antaŭenjetis sian hakilon kun la ritma krio: Ho ruk! Ho ruk!*
stop! por haltigi maŝinon, kaj en la marista lingvo.
tpr!^Z por eksciti ĉevalon.

Sentesprimaj interjekcioj

ha!^Z la plej simpla, por esprimi la ekmiron, surprizon, jen en bona, jen en malbona senco: *ha! kiel agrabla! Ha! kia ĉarmulo!*^Z; *Ha! – Kial vi tiel ektimis, sinjorino?*^Z
ha ha!^Z ripetita montras:
 a) pli vivan senton doloran: *ha ha! ekĝemis la malgranda Niko*^Z;
 b) ironion: *ha ha! tia estus la afero? Gardu vin!*^Z
 c) ridon: *li ne povis sin deteni: ha ha! li eksplodis...*
ho!^Z esprimas simple la vivecon de sento: oni uzas ĝin preskaŭ nur kun alparolajo: *ho jes!*^Z *ho ne!*^Z *ho miaj esperoj!*^Z *ho kia malfeliĉo!*^Z *ho terure!*^Z

Post tiuj du tre ĝeneralaj interjekcioj, ni listigas tiujn, kiuj estas trov-eblaj ĉe Zamenhof, Kabe, kaj aliaj bonaj aŭtoroj:

aha!^Z signas, ke oni ekrimarkas ion: *jen venas la du advokatoj, sinjoro! diris Clemency – Aha! ekkriis la doktoro...*^Z

aĥ! estas pli forta *ha!*: *aĥ! kiel domaĝe!*

aj!^Z montras:

a) subitan suferon: *aj! mia dento! Pingloj, je kiuj oni pikiĝas: aj! oni ek-krias*^Z.

b) tre vivan ĝojon: *Ili sin kisas! Efektiva fianĉo! Aj, Antono! Aj, Antono! Aj, urbestro!*^Z Tiu uzo estas tute ne internacia (= *hura!*).

ba!^Z por montri nekredemon: *ba! li diris do tion? Neeble!*

bas! por vikle mallaŭdi iun (la bonaj esperantistoj, esence entuziasmoj, neniam uzas tiun fi-kriion). Vd. § 408, Rim. II.

be!^Z por montri konfuzitecon: *be! li staras senhelpe, tiun respondon li ne atendis*^Z.

brr!^B por montri frostiĝon: *brr! kia malvarmo!*^B

ehe!^Z montras ekkomprenon: (URBESTRO *al si mem*) *Ehe, mi scias,*

mia kara, kien vi celas!^Z

ej!^K por montri dubeton, mildan malaprobton: *ej! vi kredas iom tro facile la onidirojn; ej! ej! ne tiru min tiel forte!*

fi!^Z por esprimi naŭzon, mallaŭdon: *fi! tio estas ŝlimo!*^Z *fi, kia malbon-kondukta knabo!*^Z (oni diras: *ha fi!* sed ne *ho fi!*).

fu! por esprimi laciĝon: *fu! mi finis tiun diablan taskon! fu!* kiel bone *sidiĝi post longa paŝado!* aŭ detenatan ridon: *iafoje ĉambristino enmon-triĝas tia... fu! fu! fu!*^Z

hi hi! nerva, aŭ knabina rido.

hm!^Z estas uzata:

a) por esprimi, ke la parolanto povus ja ion kontraŭdiri, kontesti, sed preferas silenti: *li estas la plej granda esperantisto!* – *Hm! se vi volas...*

b) por esprimi ĝenatecon, konfuzitecon: *La instruisto: Kia estas la dato de la Kontrakto de Helsinki? La lernanto: Hm! hm! ĉu ĝi vere interesas vin?*

c) por simuli tuson kaj averti iun, ke oni ĉeestas: *ŝi ektusis: hm! hm! hu!*^Z por esprimi ektimon: *hu! li ekkriis kaj forsaltis!*^Z; *hu! ekkriis la vilaĝano, tio estus efektive tre malbela!*^Z (vidi la diablon); *hu!* kiel *rapide li rajdis!*^Z

huj! aŭ!^Z *oj!*^Z por esprimi subitan suferon: *oj! vi piedpremis mian piedon!*^Z; *aŭ! ekkriis la virino, ĉar la filino mordis ŝin en la orelo!*^Z; *huj, huj! mi havas spasmon!*

hura!^Z estas uzata:

a) por esprimi tre vivan ĝojon kaj aprobon samtempe: *ĉiuj aplaŭdis kaj laŭte aprobis, kaj Knut kriis: hura!*^Z

b) ĉe amasa atako, por stimuli, ebrigi sin mem kaj la aliajn kaj por timigi la malamikojn.

nu!^Z estas uzata:

a) por sentigi, ke oni deziras ĉesigi interparoladon: *nu, bonan nokton!*^Z; *nu, pri tio ni parolos alian fojon!*

b) por instigi al parolo: *nu, kio okazis? Mi vidas, ke vi havas ion por diri; nu?*

oho!^Z esprimas la surprizon: (Ĥ. *kalkulas la donacitan monon*) *Okcent, naŭcent... oho! transpasas milon!*^Z

oj! bedaŭro facila.

pa, pa!^Z por esprimi senzorgecon: *pa, pa! ĉio kun la tempo aranĝiĝos!*

uf! uff! esprimas laciĝon (vd. *fu!*).

ve!^Z por esprimi doloron, iom patose aŭ elokvente: *ho ve! ve al ni! ni estas ruinigita!*^Z.

Onomatopeoj

126

Al la interjekcioj, oni povas almeti la onomatopeojn, kiuj servas por imiti la blekojn:

glu-glu-glu (meleagroj)

kluk, kluk (kokinoj)

kokeriko (koko)

küaks, küaks, brekekeks (bufoj)

kurre, kurre (kolomboj)

kva, kva (ranoj)

kvivit, kvivit (paseroj)

pep, pep (kanarioj)

pip, pip (musoj, anasidoj)

put, put, put (serĉantaj kokinoj)

aŭ la bruojn:

bam! (bato de tursonorilo)

bum! (kanono, tamburo, falego, obtuza frapo)

kluk, kluk (akvo fluanta el botelo: *glu-glu* estus pli bona)

pif-paf! (pafo, brulanta keno)

puf! (falo)

pum! (falego)

tik-tak (horloĝo)

tin, tin (sonorileto)

ta, ta, ta aŭ *tra ra ra* (rapidega babilado)

tratteratra (trumpetado).

Ĉiuj tiuj onomatopeoj estas Z-aj. Oni devus aldoni al ili almenaŭ

la la la aŭ *tra la la* (danc-ario).

Ofte ankaŭ Z., por krei onomatopeojn, uzas la radikon aŭ la unuan

silabon de la koncerna vorto: *krak! la silikvo krevis!*² *mur, mur, mur!*

*Tiel ili (kolomboj) murmuradis*²; *plau!* *ŝi ensaltis en la akvon!*² (кп.

plaŭdi); *rap! rap! rap! rapidu, rapidu! kriis la anasino*².

Laŭ la sama metodo oni povas uzi *boj! boj!* por la hundobleko, *miaŭ!*

miaŭ! por la katobleko ktp.

LA FRAZO

Pri la frazo okupiĝas la **Sintakso**.

Ĝi estas la plej komplika parto de la gramatiko: ĝi studas tiujn per formo-modifoj videbligatajn rilatojn, kiujn la logiko aŭ la uzado starigas inter la vortoj, uzante ilin por esprimi penson. Tiuj rilatoj estas multaj kaj diversaj. Oni povas klasi ilin en tri kategoriojn, laŭ ilia grado de komplekseco:

1. La unua kategorio koncernas la elementan grupiĝon de vortoj por esprimado de ideo; ekz-e: adjektivo rilatanta al substantivo; prepozitivo rilatanta al adjektivo. En tia funkcio, la vortoj ne estas strikte ligitaj kun la strukturo de la frazo, sed ili rilatas nur al unu aŭ alia *vorto* en la propozicio (*karakterizaj frazelementoj*). Tiun parton de la sintakso, kiu okupiĝas pri ili, oni povas nomi **Vortsintakso**.

2. La dua kategorio koncernas la kuniĝon de tiuj vortoj aŭ vortgrupoj ĉirkaŭ la predikato por la esprimado de opinio: ekz-e subjekto + verbo + objekto. En tia funkcio, la vortoj estas strikte ligitaj kun la strukturo de la frazo (*strukturaj frazelementoj*). Tiun parton de la sintakso, kiu okupiĝas pri ili, oni povas nomi **Propozicio-sintakso**.

3. La tria kategorio koncernas la aranĝon de tiaj kuniĝoj en pli vastajn sistemojn por la esprimado de pluraj interĉenitaj opinioj; ekz-e: ĉef-propozicio + tempa subpropozicio. Pri tiu parto de sintakso okupiĝas la **Frazsintakso**.

Ni dividis do la sintakson en la supre nomitajn tri ĉapitrojn, sed en la tria ni apartigos de la **Kompleksa Frazo** la studon pri la **Vortordo**, ĉar la aranĝo de la vortoj en la frazo, kvankam ĝi estas plejofte afero de stilo, obeas tamen al kelkaj reguloj truditaj aŭ de klareco aŭ de la uzado.

I. VORTSINTAKSO

Se oni rigardas serion da frazoj, oni facile rimarkos, ke la vortoj formas, interne de la propozicioj, plurajn elementajn grupojn, ĉirkaŭ kelkaj kerno-vortoj. Tiaj centroj de grupiĝo estas la **substantivo**, la **adjektivo**, la **adverbo** kaj la **verbo**. Ni studos ilin, kun iliaj komplementoj, unu post la alia.

127

A. SUBSTANTIVA KERNO-VORTO

128

Ni vidis (§ 25), ke la substantivo povas akcepti du specojn de akcesoraj komplementoj: la epitetojn kaj la diversajn suplementojn.

I. LA EPITETOJ

La epiteto estas frazelemento senpere determinanta substantivon aŭ pronomon. Ĝi povas havi du formojn: adjektivan: *nenio nova sub la suno^z*; *lingvo internacia^z*; *malfacila tasko*; kaj substantivan: *la lingvistoj esperantistoj*; *ni, esperantistoj*. Meze inter ili staras la substantivfunkcia adjektivo: *mi ankaŭ, la mizera, iros fari aferon mian^z* (= la mizerulo). Vd. § 132. 1. Rim. I.

Rim. La epiteto povas esti kelkfoje malproksimigita de la determinata substantivo kaj tiel akiri valoron de preskaŭa manieradjekto: *la grandaj ĉevaloj eksaltis kaj refalis, gigantaj, inter la vicoj de la anglaj soldatoj* (ili ne estas gigantaj per si mem, sed aspektas tiaj nur okaze de sia refalo). Tian epiteton ni nomas "adjekta predikativo" (vd. § 170.4.).

ADJEKTIVA EPITETO

La adjektiva epiteto estas la formo plej ofta apud substantivo: *la blanka domo estas mia*; *la blankaj domoj estas miaj*; *ĉu vi vidas la blankan domon? la blankajn domojn? la kongreso havas nenion komunan kun la politiko^z*.

1. Pri la vortordo vd. § 272. 5.

2. La epiteto adjektiva ĉiam akordiĝas kun la determinato laŭ nombro kaj laŭ kazo.

Kiam unu adjektiva epiteto karakterizas samtempe du aŭ plurajn substantivojn, el kiuj unu staras en singularo, ĝi devas mem stari en pluralo: *ni havas freŝajn panon kaj akvon* (se oni dirus: *ni havas freŝan panon kaj akvon*, nur de la pano oni asertus la freŝecon; inverse nur tiun de la akvo per: *ni havas panon kaj akvon freŝan*); *mi havas fidelajn amikon kaj kolegon* (se oni dirus: *mi havas fidelan amikon kaj kolegon*, oni komprenus, ke temas nur pri unu amiko-kolego).

Rim. I. Z. uzas singularan posedan adjektivon, kiam ĝi rilatas al pluraj substantivoj: *mia frato kaj fratino*. Ĉar tio neniam kreas konfuzon, tio estas ne nur allasbla, sed eĉ preferinda al la plurala formo (*miaj*), kiu sonas iel fremde. Oni povas ĝin eviti, cetere, ankaŭ per la ripeto de la poseda adjektivo (lia frato kaj lia fratino). La samo rilatas ankaŭ al la tabel-adjektivoj (*tiu, tia* ktp.).

Krome Z. uzas ofte singularan adjektivon antaŭ pluraj substantivoj abstraktaj: *la simpla lernado kaj uzado de Esperanto*². Ankaŭ tio ŝajnas plene pravigebla.

Kiam pluraj epitetoj karakterizas unu pluralan substantivon, sed ĉiu el ili rilatas aparte al po unu el la aferoj ope montritaj de la substantivo, ili staras en singularo: *la malnova kaj nova Testamentoj* (= malnova Testamento + nova Testamento); *la juĝista, komerca kaj financa ministroj*.

3. Aparte menciinda estas la afero de la participa epiteto. Ĝi havas la valoron de adjektivo, tamen la diferenco estas, ke ĝi esprimas agon aŭ staton anstataŭ kvaliton. Plejofte ĝi estas akompanata de la artikolo, kaj, se ĝi estas antaŭmetita, ĝi estas enfermita inter la artikolo kaj la substantivo. Ĝi estas ĉiam anstataŭigebla per relativa epiteta subpropozicio, kies predikato estas la participa verbo: *la falinta homo* (= la homo, kiu falis) *ne povis sin levi*²; *korniko vundita* (korniko, kiu estis vundita) *propran voston timas*²; *Lot eliris, kaj parolis kun siaj bofiloj, prenontaj* (= kiuj estis prenontaj) *liajn filinojn*²; *li kuniĝis kun li por fari ŝipojn, irontajn* (= kiuj irados) *en Tarsison*²; *ekzistas neniu, faranta bonon* (Biblio; Kp. la Z-an tekston: *ne ekzistas homo, kiu faras bonon*); *la junecon mi ploranta* (= mi, kiu ploradis) *metis mem sur la altaron de la devo*²; *en la laboro de S-ro Schleyer mi vidas malfeliĉan provon, konstruitan sur erara fundamento kaj ne havantan estontecon*² (= kiu estas konstruita... kaj ne havas...). Vd. ankoraŭ § 158 kaj § 183 II.

Cetere la participa epiteto akordiĝas tute same kiel la adjektiva, kaj, se ĝi determinas akuzativan substantivon, ĝi regule staras en akuzativo, eĉ kiam ĝi havas mem akuzativan objekton, kiel en kelkaj el la ĉi-supraj ekzemploj; tio certigas la ĝustan komprenon: en la lasta ĉi-supra ekzemplo; *konstruita* kaj *havanta* ricevas alian signifon (vd. § 172).

Rim. II. Substantivo povas esti determinata nur per adjektivo-forma vorto. Do, se oni substantivigas adjektivon aŭ verbon, determinitajn per adverbo, tiu adverbo regule fariĝas adjektivo: *eksterordinare bela* iĝas *eksterordinara belo*, *tro vantema* iĝas *troo vantemo*. Sed tiu transformo ne ĉiam povas okazi, ĉar la adjektivo kelkfoje akiras alian signifon ol la responda adverbo; ekz-e, se de *nejuste kondamnita* ni faras *la nejusta kondamnito*, ni ŝanĝas la sencon, kaj parolas pri kondamnito, kiu agas nejuste, kaj ne pri iu, kiu estis nejuste kondamnita; se de *multe amataj* (virinoj) ni tiras *multaj amatinoj*, ni aliigas la sencon, parolante pri multaj inoj amataj, sed ne pri inoj multe amataj. En tiaj okazoj, oni povas uzi du rimedojn:

1. konservi la adjektivan formon, per substantiva uzado (= *la nejuste kondamnita*), aŭ almeti substantivon (*la multe amataj virinoj*); tiu rimedo estas la plej rekomendinda, ĉar ĝi klarigas la penson kaj malpezigas la frazon.

2. konservi la adverbon, sed ligi ĝin per streketo al la substantivo, en unu kunmetaĵon: *la ĉie-konato*, *la baldaŭ-savotoj*. Eĉ, kun unusilabaj adverboj, oni ne bezonas streketon, se ne ekzistas danĝero de miskompreno: *la Plejsupro*, *la plimulto*, *la foriro* – sed: *la tro-vanto*, *la plu-vago* ktp.

Rim. III. Kiam la epiteto konsistas el kunmetaĵo de du adjektivoj, oni povas meti ambaŭ en pluralon aŭ en akuzativon: *klarigaj-adversaj propozicioj*; *iran-reiran bileton*; kaj oni povas deklinacii nur la duan: *vortaron franca-esperantan*². La

unua formo ŝajnas preferinda. Kp. § 309.

Rim. IV. Per adjektiva epitetoj kaj **Moŝto** oni esprimas la ĝentiltitolojn: *Lia Papa Moŝto, Lia princa Moŝto; sinjora moŝto.*

Rim. V. Pri la *adjektiva apozicio* vd. § 132. 1. Rim. I.

SUBSTANTIVA EPITETO

Divido

129

La substantivo estas malpli strikte ligebla al alia substantivo ol la adjektivo; tial ĝi konservas pli grandan memstarecon, kaj la substantiva epitetoj alprenas pli multajn formojn ol la adjektiva.

La rilatoj inter la du apudaj substantivoj povas esti trispecaj:

1. La dua substantivo signas pli vastan klason da objektoj aŭ malpli difinitan objekton ol la unua: *la koko vekas nin dormantojn (dormantoj signas pli vastan klason da estaĵoj ol ni); la diablo lin prenu, la sentaŭgulon (sentaŭgulo estas malpli difinita ol li);* oni povas diri, ke la dua substantivo havas pli ampleksan signifon ol la unua. En tia okazo, la aparteno al tia pli ampleksa klaso montras ĉiam kvaliton de la unua substantivo, do la dua substantivo estas tute analoga al adjektiva epitetoj. Oni povas ĝin nomi **a p u d m e t o** aŭ **a p o z i c i o** kaj la unuan substantivon **d e t e r m i n a t o**.

2. La dua substantivo havas signifon kun precize la sama amplekso kiel la unua: ĝi do prezentas simple nur alian manieron nomi la objekton: *la makropo aŭ kanguruo povas esti dresata* (la du nomoj difinas precize la saman beston). En tia okazo oni povas ilin nomi **e k v i v a l e n t o j**.

3. La dua substantivo havas malpli grandan amplekson ol la unua, kaj prezentas ties propran nomon: *la monato Septembro (Septembro difinas nur unu el la dek du monatoj).* En tia okazo, propre la dua substantivo estas la determinato kaj la unua estas la determinanto, anoncanta tiun pli-malpli ĝeneralan kategorion, al kiu la ideo de la dua substantivo apartenas. Tial, tiun unuan substantivon oni povas nomi **a n o n c v o r t o**, kaj la duan, ĉar ĝi ĉiam esprimas la individuan *nomon* de io, **n o m i n a c i o**.

Ni pritraktos aparte tiujn tri okazojn.

Apudmeto (apozicio)

130

Oni trovas apudmeton precipe post pronomoj aŭ propraj nomoj: *ni, esperantistoj, devas labori pli energie ol iam²; la diablo lin prenu, la sentaŭgulon!² Dio indulgu nin pekulojn!² Adam ekkonis Evan, sian edzinon²; Cila naskis Tubalkainon, forĝanton de diversaj majstraĵoj²; la koko, trumpetisto de l' mateno, vekas nin dormantojn².*

Ŝed oni povas trovi ĝin ankaŭ kiel resumon, (ordinare kun valoro de sintezo aŭ antitezo), post elnombrado de ideoj aŭ de agoj: *la hundo saltetis, ekstaris sur du piedoj, ŝancelis la kapon, prezentis la antaŭan piedeton, salutis per orelmovo – vera cirka laboro; li sin defendis per*

grandaj protestoj, indignaj krioj, insultoj al siaj akuzantoj – malfortaj argumentoj.

Kiel oni vidis en la ĉi-supraj ekzemploj, la apudmeto akordiĝas kaze kun sia determinato. Sed, kiam ĉi tiu staras en prepozitivo, oni ordinare ne ripetas la prepozicion antaŭ la apudmeto: *ni esprimas nian dankon al sinjoro Schleyer, la unua pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia^Z* (ne: *al la unua...*). Tamen, en patosa frazo, tio estas ebla, kaj ordinare akompanas akcentatan ordigon de la frazo (Kp. § 274): *al li, al mia sola amiko, mi ŝuldas mian vivon.*

La apudmeto akordiĝas ankaŭ nombre kun sia determinato. Oni devas noti, ke same kiel la adjektiva epiteto, ĝi staras en pluralo, se ĝi determinas plurajn singularajn aferojn: *se vidas vi Marcellon, Horacion, kolegojn miajn, rapidigu ilin^Z; mi kaj li, ĉiamaj amikoj, ekdisputis unu tagon.* Tamen, se ĝi havas valoron de resumo, ĝi povas stari en singularo ankaŭ post plurala vorto: *viroj, virinoj, sklavo, infanoj, la tuta popolo svarmis en la stratoj; jen ĉiuj miaj libroj, la ĝojo de mia vivo.*

Rim. La ideo esprimita de la apudmeto povas esti pli aŭ malpli proksima al tiu esprimita de la determinato: ju pli malproksimaj ili estas unu de la alia, des pli granda paŭzo apartigas ilin en la parola lingvo, dum en la skriba, la simpla komo povas tiam esti anstataŭata de haltostreko; male, kiam la du ideoj estas nature tre proksimaj, ili povas facile kunfandiĝi en unun, kaj esti rigardataj kiel unu kunmetita vorto: tiam la komon anstataŭas dividstreko: *mi vokas al ĉiuj esperantistoj-batalantoj^Z* (Kp.: *la batalantaro esperantista^Z*). Tio povas okazi nur, kiam la determinato estas komuna vorto, kaj la apudmeto ne havas suplementon. Pri tiu formo de kunmetado per substantiva epiteto, vd. § 291.3.

Ekvivalentoj

La ekvivalentoj estas plejparte konstruitaj pere de adverbo (*nome, alinome*), de konjunkcio (*aŭ*) aŭ de la esprimo *tio estas* (kutime skribata: *t.e.*): *Clémenceau, alinome la Tigro; la simpla esperantisteco, t.e. la simpla lernado kaj uzado de Esperanto^Z.*

Rim. I. Post la ekvivalenta aŭ la artikolo ne estas ripetata: *la makrocefalo aŭ kaĉaloto vivas precipe en nordaj maroj; patriotismo aŭ servado al la patrujo mi nomas nur la servadon al la bono de ĉiuj miaj sampatrujanoj^Z.* Male post la alternativa aŭ oni ripetas la artikolon: *ĉu vi rompis la glason aŭ la karafon?*

Tamen, ili povas esti konstruitaj ankaŭ senpere, signite en la skriba lingvo per komo aŭ dupunkto; tio okazas precipe, kiam la ekvivalento resumas per unu vorto ideon, esprimitan per pluraj vortoj: *la plej nobla sento de la homo: la homamo.* Oni vidas, ke tiu resuma ekvivalento distingiĝas de la resuma apudmeto per tio, ke la apudmeto resumas elnombradon, la ekvivalento resumas difinon.

La ekvivalentoj ĉiam akordiĝas kaze inter si: *la akuzativo montras direktan, t.e. movadon al ia loko^Z; por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t.e. dek frankojn^Z; al la lernado ni povas dediĉi nur parton de nia mallonga vivo, nome niajn infanajn jarojn^Z; la nitrogenon aŭ azoton*

oni signas per N; plenumi la plej simplan agon de la vivo, la digestadon. La akordo laŭ nombro dependas nur de la signifo, kiel montras la ĉi-supraj ekzemploj.

Ili montras ankaŭ, ke la ekvivalento estas transira formo inter la apudmeto kaj la nomesperimo, kaj proksimiĝas jen al la unu, jen al la alia. Meze staras, kiel pura ekvivalento, la indiko de duobla nomo (*la nitrogeno aŭ azoto*); la kromnomoj (*la Tigro*) proksimiĝas al la apudmeto, la resuma ekvivalento al la nomesperimo.

Rim. II. Aparta okazo de la ekvivalento estas la *el nombrado*; tiu ĉi do same akordiĝas kaze kun la anoncvorto: *Esav prenis siajn edzinojn el la Kanaanidinoj: Adan... kaj Oholibaman... kaj Basmaton...²; alportu al la homo donacon: iom da balzamo, kaj iom da mielo, aromaĵon kaj mirhon, pistakojn kaj migdalojn²; oni povas proponi internaciajn sistemojn por la oportuneco de la rilatoj internaciaj, kiel ekzemple internacian monsystemon, horsystemon, kalendaron ktp.²; li laboras pri du verkoj, pri romano kaj pri teatraĵo.*

Sed la ripeto de la sama kazo fariĝas tre peza, precipe kiam la elnombrado estas longa. Tial, oni penas eviti tiajn elnombradojn en alia kazo ol nominativo; se tion oni ne povas tamen eviti, oni helpas al si per jenaj rimedoj:

akuzativon oni povas forigi, intermetante "*ili estas*": *mi proponas al vi kvar nomojn; ili estas: sro Kuhl, sro Grabowski, sro Dervaux, sro Boulet²;*

prepozitivan oni povas eviti, subkomprenante la prepozicion: *li laboras pri du verkoj, romano kaj teatraĵo;*

fine, la akuzativon de direkto oni povas simple forlasi: *la loĝantaro dividiĝas en kvar lingvajn elementojn: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj.*

Nominacio

132

Ni vidis supre, ke la nominacio prezentas ies individuan nomon kaj ke ĝin antaŭas pli vastsenca anoncvorto. Ĝi estas ligita ĉiam senpere, sen prepozicio: *la monato Septembro* (kp. *la tagoj de Septembro*); *la vorto a m o.*

Inter la nominacioj oni povas distingi tri specojn:

La nominacio povas indiki per la propra nomo certan individuon aŭ individuan objekton: *lia filo Karlo*. Tio estas la *n o m e s p r i m o*.

Ĝi povas indiki nomon aŭ vorton en si mem, sen indiko de individuaĵo, kiel malplenan nomon: *la nomo Karlo*. Tio estas la *c i t a ĵ o*.

Fine, ĝi povas indiki ies nomon por lin alparoli: *mi amas vin, Karlo*. Tio estas la *v o k a t i v o*.

I. N o m e s p r i m o.

Ĝi estas ligita senpere al sia anoncvorto, sen prepozicio, sen komo.

Ĝi estigas demandon nur pri unu punkto: pri la kaza akordiĝo kun la anoncvorto. Sed tiu demando estas iom delikata.

La lingvokutimoj de Z. estas ĉi-koncerne jenaj:

1. kiam la propra nomo estas asimilita aŭ asimilebla, li ordinaro akordiĝas ĝin kun la anoncvorto, same kiel la aliajn epitetojn: *Abraham prenis sian filon Izmaelon; li elektis la monton Cionon; ili forsendis sian frat-inon Rebekan; tiu rivero ĉirkaŭas la tutan landon Etiopujon; ŝi forgesis*

sian kuneedukiton Kajon; li atingis la ĉarmegan urbon Nurenbergon (la Bibliaj ekzemploj estas laŭ la origina teksto; en la Londona eldono la Biblia Komitato nominativigis ĉiujn nomessprimojn). Tamen, li faras ankaŭ esceptojn: *sed vespere li prenis sian filinon Lea; la filoj de Izrael ekveturigis sian patron Jakob; rajdigu mian filon Salomono sur mia mulo; li ne komprenas la lingvon Esperanto.*

2. kiam la propra nomo estas moderna familia aŭ neasimilita persona nomo, Z. ne akordigas ĝin; certe aldoni la finaĵon al tiuj fremdaj elementoj ŝajnis al li nekonvena: *ni perdis ankaŭ... profesoron Michael Forster; la noblan kavalion Tannhäuser la amkantiston;* la regulo kaj la escepto aperas samtempe en jena frazo: *por akcepti sinjorinon Marta Swicka, ni ne povas ja forigi fraŭlinon Sofion.* Same li ne akordigas la urbnojmojn: *ni transloĝigis en la urbon Grodno;* nek la stratnojmojn: *Marta iris sur la straton Długa; ŝi direktis sin sur la straton Swieto-Krzyska.* Kp. § 133. I. A. Rim.

3. kiam la propra nomo estas titolo, Z. same ne akordigas ĝin: *mi sendis al vi la gazeton "La Esperantisto"; la broŝuron "Homaranismo" mi ricevis; ŝi sciis ankaŭ la teatraĵon "Valdemar kaj Absalon".*

La Z-a lingvuzo do ne estas unueca; oni trovas, en analogaj okazoj, jen akordiĝon, jen neakordiĝon. Nu, ĉar la okazoj sub 2. kaj 3. estas multe pli multnombraj, kaj ĉar ankaŭ ĉe la okazoj sub 1. ekzistas esceptoj, la lingvuzo montras evidentan tendencon al unueca neakordo. Teorie pravigas tion la parenceco inter la nomessprimo kaj la "ne-akordiĝanta" citaĵo, kaj certe en tia direkto influos la lingvon ankaŭ la tre disvastigita Londona Biblio, kie la Biblia Komitato forigis ĉiujn akordiĝojn.

Sed la afero estas (bedaŭrinde!) pli kompleksa, ol ke oni povus ĝin aranĝi per la sola regulo de neakordiĝo. Efektive, se oni esploras multajn ekzemplojn, oni konstato, ke la nomessprimo ne estas ĉiam strikte ligita al sia anoncvorto: kelkfoje ĝi estas tre nete apartigita, tiel ke la voĉo egale akcentas aparte la nomessprimon kaj la anoncvorton, kaj intermetas malgrandan paŭzon, por samgrade reliefigi ilin ambaŭ. Kaj oni rimarkos, ke per tiu cezurita prononco ŝanĝiĝas ankaŭ la senco de la frazo. Ni rigardu ekzemplojn:

Tiel ni pasigis en la kolegio la duan monaton Oktobro(n). Tio ĉi povas signifi du aferojn, laŭ la prononcmalmaniero. Se oni egale akcentas "monaton" kaj "Oktobro(n)" kaj intermetas paŭzeton, ĉiu komprenos, ke temas pri la dua monato en la kolegio, t.e. pri Oktobro. Sed se oni ne intermetas paŭzeton, oni komprenos, ke temas pri la dua el la Oktobro-monatoj pasigitaj en la kolegio.

Li (papo Aleksandro VI) venenis eĉ kardinalon Johano(n)-Baptisto(n) Orsini. Kun paŭzeto post "kardinalon" oni komprenos, ke la rimarkinda fakto estas, ke papo venenis kardinalon: sen paŭzeto oni komprenos, ke rimarkinde estas, ke li venenis Orsini-n.

Tiun sencdiferencon certe ĉiu sentas pli-malpli klare. Kaj en skribo oni signas tiun paŭzeton per komo.

Se oni rigardas la demandon el la vidpunkto de la akordiĝo, oni nature emas akordigi la nomessprimon, kiam per la paŭzeto ĝi kvazaŭ memstariga disde la anoncvorto: *tiel ni pasigis en la kolegio la duan monaton, Oktobron; li venenis eĉ kardinalon, Johano-Baptiston Orsini.* Male, kiam la nomessprimo tute strikte ligiĝas al la

anoncvorto, farante kun tiu unu blokon, oni emas ĝin neakordigi kaj lasi en nominativo: *tiel ni pasigis... la duan monaton Oktobro; li venis eĉ (la) kardinalon Johano-Baptisto Orsini.*

Kaj tiu emo estas tre logika. Efektive, kiam la nomesperimo estas memstarigita, estas plene motivite, ke ĝi staru en la sama kazo kiel la anoncvorto: ili ja havas tute la saman valoron, kion provas, ke ilia sinsekvo povas inversiĝi, sen ŝanĝo de signifo kaj de kazo: *tiel ni pasigis... Oktobron, la duan monaton; li venis eĉ Johanon Orsini, (unu) kardinalon.* Male, kiam la nomesperimo rekte dependas de la anoncvorto, estas logike, ke tiu dependeco estu iel esprimita; sed ĉar ne ekzistas aparta tiucela prepozicio, la sola uzebla rimedo estas tiu "signo nula", kiun prezentas la nominativo: la kontrasto inter akuzativa anoncvorto kaj nominativa nomesperimo sufiĉas por averti pri la gramatika dependeco inter tiuj du vortoj, same kiel ĉe la objekta predikativo (vd. § 171).

Rim. I. Analogan aferon oni vidas ankaŭ ĉe adjektiva epiteto. Ekz-e: *lasta dinastio franca* signifas la lastan el la francaj dinastioj; tie ĉi *dinastio franca* formas unu tuton kaj *lasta* rilatas al tiu tuto. Male: *la lasta dinastio, la Burbona* signifas, ke la lasta dinastio estas la Burbona; ĉi tie do la postmetita adjektiva epiteto memstariga, kaj *lasta* rilatas nur al *dinastio*. Tia memstarigita adjektiva epiteto estas distingita ĉiam per la artikolo, per tio ĝi akiras la funkcion de substantivo. Tial en tiaj okazoj oni povas paroli pri *adjektiva apozicio*.

Kvankam la lingva sento plejofte bone orientas pri la ĉi tie proponata uzado, ne estos superflue esplori detale la diversajn okazojn, kiam oni akordigas la nomesperimon kaj kiam ne. Tiu detala esploro estas iom kompleksa, sed se oni memoros la ĉi-suprajn ĝeneralajn konsiderojn, oni ĝin facile sekvos.

Do nomesperimo ne akordiĝas kaj restas ĉiam en nominativo, kiam ĝi faras unu blokon kun sia anoncvorto, do kiam nenio intervenas por rompi tiun blokon, aŭ interŝoviĝante inter la du elementojn, aŭ koncerne unu el ili sendepende de la alia aŭ akcentigante egale ilin ambaŭ. La postuloj, por ke tiu bloko kunstaru nerompite, estas jene resum-eblaj:

- a) la anoncvorto devas stari senpere antaŭ la nomesperimo;
- b) la anoncvorto devas esprimi vastan kategorion de individuajoj, el kiuj nur la nomesperimo elektas kaj precizigas la aktualan;
- c) la anoncvorto devas ne esti determinita aparte sendepende de la nomesperimo.

Se tiuj postuloj ne estas plenumataj, la nomesperimo memstariga. Tion oni signas per komo en skribo kaj per paŭzeto en parolo, krome per akordiĝo, se la anoncvorto estas akuzativa.

Nun ni vidu detale la obeon aŭ neobeon al postuloj montritaj sub punktoj a-c.

Pri a) Memstariga kaj akordiĝas la nomesperimo, se inter ĝi kaj la anoncvorto estas intermetita:

aa) suplemento de la anoncvorto: *filon de mia amiko, Karlon (filon de mia amiko Karlo)* signifus, ke la *amiko* estas Karlo);

bb) epiteto de la nomesperimo: *li perdis sian filon, la amatan Petron.* Se

ekzistas du anoncvortoj, la dua memstarigās kaj faras blokon kun la nomesperimo: *sian sinjoron, la reĝon David*² (ne: *sian sinjoron reĝo David*).

Rim. II. Ne akordiĝas la nomesperimo, se ties epiteto prezentas parton de la nomo mem: *la hotelon Blanka Ĉevalo; imperiestron Karlo la Granda*; aŭ se la epiteto de la nomesperimo estas postmetita: *lian filon Petro, la amindan bubon*; aŭ se la suplemento sekvas la nomesperimon: *la lingvon Esperanto de Zamenhof* (kp. *la lingvon de Zamenhof, Esperanton*). Kiel oni vidas, la nomesperimo ne akordiĝas nur, se ĝi sekvas la anoncvorton senpere.

Rim. III. Kiam apudmeto determinas nomesperimon, ĝi akordiĝas ne kun la nomesperimo, sed kun la anoncvorto. Tion nepre postulas la klareco; ekz-e, en la frazo: *li prenis sian edzinon Oholibama, filino de Ana, fratino de Basmat* – oni ne povas scii, kiu estas la fratino de Basmat; male, se oni akordiĝas la apudmeton kun la anoncvorto, la frazo iĝas klara: ... *sian edzinon Oholibama, filinon de Ana, fratino de Basmat* (la fratino estas Ana): aŭ: ... *sian edzinon Oholibama, filinon de Ana, fratino de Basmat* (la fratino estas Oholibama). En la unua eldono ni indikis akordiĝon kun la nomesperimo (nominativo) laŭ jena frazo de la Londona Biblio: *Terah prenis... sian nepon Lot, filo de Haran, kaj sian bofilinon Saraj, edzino de lia filo Abram*. Sed tio estas korekto de la Biblia Komitato pri tre diferenca Z-a teksto: *Terah prenis... Loton, la filon de Haran, sian nepon, kaj Sarajon, sian bofilinon, la edzinon de sia filo Abramo*. El tiu teksto do oni povas tiri nenian orientiĝon. Sed la kriterio de klareco estas sufiĉe forta por trudi la supran regulon kaj malaprobige la Londonan tekston.

Tamen, prepozicio povas esti subkomprenata antaŭ tia apudmeto kaj ankaŭ la akuzativon de direkto ĝi ne alprenas: *ni vojaĝis en la prinuĉojn Monako, ĉarma paca landeto*.

Pri b) Memstarigās kaj akordiĝas la nomesperimo:

aa) se la anoncvorto jam en si mem signifas la saman ununuran aferon kiel la nomesperimo: *la Kristnask-monaton, Decembron* (ekzistas nur unu Kristnask-monato); tiam temas pri perfekta ekvivalento.

bb) se la anoncvorton memstarigas la fraz-akcento: *mi renkontis tie amikon, Petron Frank; li havis praavon, Bertrandon de Sotenville*²; tie ĉi la anoncvorto esprimas la ĉefan aserton, temas ja pri tio, ke iu havis praavon, ke iu renkontis amikon. (Kp. *mi renkontos tie mian amikon Petro Frank* – ĉi tie la ĉefa aserto estas, ke mi renkontos Petron Frank, kaj "mia amiko" estas nur flanka determino, do efektiva anoncvorto; dum en la antaŭaj okazoj la akcento levas la anoncvorton al valoro de ekvivalento).

Rim. IV. En tiaj okazoj la memstarigon signas ankaŭ la nedifiniteco, do la manko de la artikolo (vd. la suprajn ekzemplojn kaj sube pri c. aa); aŭ la nedifina determino de la anoncvorto: *mi renkontis tie certan (ian, unu) amikon, Petron Frank*. Tamen oni ne konfuzu tiun nedifinitecon kun la manko de artikolo antaŭ honoritoloj: *Doktoron Ludoviko Zamenhof* (kp. § 77. Rim. IV.). Sed kompreneble ankaŭ en tiaj okazoj povas ricevi la anoncvorto specialan akcenton: *oni trovas inter la kondamnitaj eĉ doktoron, Brunon Karg* (la surprizo estas, ke oni trovas inter ili eĉ doktoron); male: *oni trovas inter ili eĉ doktoron Bruno Karg* (la surprizo estas, ke oni trovas inter ili Brunon Karg mem).

Pri *c)*. Por komprenebligi ĉi tiun postulon, oni memoru, ke la nom-esprimo ne akordiĝas nur, se ĝi faras unu blokon kun la anoncvorto. Ĉiu determinilo do, kiu rilatas nur al ĉi tiu lasta, rompas la blokon, sekve liberigas la nomesperimon kaj ĉi tiu reakiras la kazon postulatan de ĝia gramatika funkcio.

Ni pritraktos laŭvice ĉiujn determinilojn starantajn antaŭ la anoncvorto (pri la suplemento, staranta malantaŭe, ni jam parolis).

aa) La artikolo rilatas ĉiam al la tuta komplekso; efektive, ĝi povas rilati nek al la nedifinita anoncvorto, nek al la propra nomo, sed nur al ambaŭ kune. Ĝi do ne influas la karakteron de la neakordiĝanta nomesperimo; eĉ, rekte indikas la karakteron de la bloko: *ĉu vi vizitis la urbon Parizo? ni supreniris la monton Vezuvio; li legis la romanon Marta; li transloĝiĝis en la hotelon Lusitania; donu al li la ĉambron numero 18.* Pri nedifinaj adjektivoj vd. supre sub Rim. III.

bb) Poseda adjektivo. Ĝi estas same rilatigebla al la tuta komplekso: *li trompis sian amikon Klemento; ili vendis sian fraton Jozefo.*

Rim. V. Tamen, oni povas rigardi la posedpronomon ankaŭ tiel, ke ĝi striktigas la sencon de la anoncvorto, proksimigante ĝin al ekvivalento; tial oni povas ankaŭ akordigi: *sian fraton, Jozefon.* Propre oni devus ĉiam akordigi, se la anoncvorto kun la posedpronomo signas nur unu imageblan estaĵon: *mia patro, lia patrino.* Sed la analogio permesas ankaŭ tie ĉi la neakordigon, malgraŭ la strikta gramatika logiko: *sian patron Jakob.*

cc) Numeralo. Ĝi postulas ĉiam akordiĝon, ĉar la esprimon oni povas rigardi elnombrado, do speco de ekvivalento: *mi vidis la du fratojn, Petron kaj Paŭlon; li punis nur unu filon, Joĉjon; reĝo, kiu havis dek unu filojn kaj unu filinon, Elizon².*

dd) Adjektiva epitetito. Tio estas la plej kompleksa okazo; oni povas distingi tri eblajojn:

1. la adjektivo rilatas al la anoncvorto sola kaj ne estas rilatigebla al la nomesperimo; tiam la bloko rompiĝas, kaj oni devas akordigi la nomesperimon: *li trompis sian bonan amikon, Paŭlon; li perdis sian kvaran filon, Maŭricon* (ne temas pri la bona Paŭlo, nek pri la kvara Maŭrico).

2. la adjektivo estas rilatigebla laŭplaĉe al la nomesperimo aŭ al la anoncvorto; tiam oni akordigas aŭ ne akordigas laŭplaĉe: *li perdis sian amatan fianĉinon Marta, aŭ sian amatan fianĉinon, Martan* (temas laŭplaĉe pri lia amata fianĉino M. aŭ pri lia fianĉino, la amata M.).

3. la adjektivo rilatas ne al la anoncvorto sed al la tuta bloko, anoncvorto plus nomesperimo; tiam oni nepre ne akordigas: *la duan reĝon Karlo* (ne temas pri la dua reĝo, sed pri la dua Karlo-reĝo; kp. *la duan reĝon, Karlon* = Karlon, la duan reĝon); *la duan projekton Esperantido* (la duan el la Esperantido-projektoj); *la franclandan urbon Vieno* (la franclandan el la Vieno-urboj).

Ni jam diris, ke ĉe nominativa anoncvorto distingas la neakordiĝantajn okazojn la komo kaj la paŭzeto inter la anoncvorto kaj la nomesperimo. Same oni distingas, kiam la propra nomo estas nevaria fremda elemen-

to: *la lastan reĝon Charles* sed: *la lastan reĝon, Charles*. Kp. § 9. Rim. II.

II. C i t a ĵ o .

La citaĵo povas konsisti el unu vorto, el pluraj vortoj, el unu frazo, el pluraj frazoj.

Kiam la citaĵo estas enkondukita per verbo kun signifo de dirado, la anoncvorto ordinare estas ellasata: *li diris: Ne! – kaj forkuris*. Tia-okaze ĉiam temas pri la citado de ies *parolo* (vd. § 227).

La anoncvorto, cetere, estas ĉiam ia indiko de vorto aŭ parolo: *nomo, vorto, titolo, ktp.*

La citaĵo gramatike estas ĉiam nevaria.

Oni povas distingi du specojn:

a) la *eksplicita citaĵo*, la plej ofta, estas anoncita en la skriblingvo per tipografia rimedo: *c i t i l o j*: *neniam uzu la vorton "amo"²* aŭ *d u p u n k t o*: *tiam uzu la pronomon: oni²*; aŭ *k u r s i v o*: *ke ni elfetu la vorton k a j²*.

Rim. I. Tie ĉi oni povas klasi ankaŭ la parantezojn, kiuj aldonas al frazo sendependan krominformon: *mi sendis al vi hodiaŭ du manuskriptojn ("Universala Vortaro" kaj "Ekzercaro")²*.

Rim. II. Kiel eksplacitan citaĵon oni povas rigardi ankaŭ la vorton post signifas, kiu indikas sencnon aŭ tradukon de alia vorto: *la germana Haus signifas Esperante d o m o*. La senco efektive estas: *signifas ĉi tion: domo*.

b) la *implicita citaĵo*, pli malofta, estas anoncita en la skriblingvo per nenia signo, kaj en la parola lingvo per simpla voĉtono: *mi ricevis de vi la titolon sinjoro de la Dandinière²*; *ĉu li ne kantis al la ĉielaj aŭskultantoj la nomon Amalio?²*; *la nove elpensita lingvo, kiu havas la nomon Esperanto²*; *ĉu vi komprenas bone la vorton mortigo?²*

Rim. III. Ĉar la familia nomo estas kvazaŭ posedaĵo de tiu, kiu ĝin portas, oni povas esprimi ies nomon ankaŭ per poseda suplemento (de): *se li ne portus la nomon de Moor!² ĉiuj esp-istoj konis la nomon de Javal²*.

III. V o k a t i v o .

La vokativo estas substantivo esprimanta la alparolatan personon. En kelkaj lingvoj ĝi havas apartan kazon, en Esp-o ĝi staras ĉiam en nominativo.

La vokativo estas parenca al la interjekcio per tio, ke ĝi efektive neniel havas gramatikajn rilatojn kun la ceteraj vortoj de la frazo, interne de kiu ĝi konsistigas specon de memstara insuleto. Tial ĝi estas ĉiam apartigita per komo.

Sed, ĝuste ĉar ĝi ne havas en Esp-o apartan kazon, ĝi povas naski, pro sia ofta pozicio fronte de la frazo, ian konfuzon kun la subjekto staranta same en nominativo: ekz-e "knabetoj helpu" povas prezenti laŭ la ĉirkaŭteksto kaj la prononco, aŭ vokativon kaj duapersonan volitivon, aŭ subjekton kaj triapersonan volitivon. Por igi klara la funkcion de vokativo oni uzas diversajn rimedojn:

1. (precipe en la skriba lingvo) oni antaŭmetas la interjekcion "ho": *ho mia kor', ne batu maltrankvile!² ho mia Dio, nur ne tion!² ho mia*

*Sinjorino Swicka!*²

2. oni inversigas la adjektivajn epitetojn kaj la substantivon: *Dio mia granda!*² Sed tiu inversigo havas tiel patosan aŭ ameman efekton, ke ordinare oni ne povas ĝin uzi.

3. oni metas tuj post la vokativo la dir-verbon: *kara Evelino, ŝi diris, pardonu...²*; *mia kara Marinjo, ŝi komencis post momento, tio ne apartenas...²*.

4. oni antaŭmetas la anoncvorton "vi": *Vi, Marinjo, ion bezonas de mi?²*; *ni atendas Vin, Savonto de la mondo!*²

En la lasta okazo, la vokativo povus, laŭ la ekstera aspekto, ŝajni simpla nomesperimo; sed de tiu ĝin distingas:

a) ke tiu anoncvorto tute ne estas necesa, kaj plej ofte ellasata: *vi eraras, Evelino, ŝi diris...²*; *ĝi vin interesas, Evelino?*²

b) ke la vokativo estas ofte komuna nomo (*amiko, filo, patro, sinjoroj, samideanoj* ktp), kaj povas esti eĉ substantivfunkcia adjektivo: *mia kara, ŝi diris²*; *mia amata!*² ktp.

c) ke la vokativon neniam povas anonci demonstrativo; tion plej klare montros jenaj du frazoj: *kiu do ŝi estas, tiu kompatinda Eminjo?*² (nomesperimo); *ha, ĝi estas vi, fraŭlino Klaro!*²; *ĉu vi konas tiun, ho stultulo?* (vokativoj).

Rim. I. En multaj lingvoj oni ĉiam antaŭmetas al la vokativo la unuapersonan posedpronomon. En Esp-o tio ne estas deviga; eĉ pli kutima estas la ellaso: *kara amiko! patro, mi suferas! venu, fileto!*

Tamen, oni ofte uzas *mia* en la sekvantaj okazoj:

a) se oni alparolas ne-homon: *ho mia kor'²*; *do nun, ho mia kapo, laboru²*; *pli rapide, mia ĉevaleta!*

b) se oni alparolas per adjektivo: *mia kara²*;

c) se oni alparolas Dion: *ho mia Dio, nur ne tion²*;

d) se oni speciale emfazas la apartenecon: *ho mia infano, mia sola infano²*; aŭ la intimecon: *sed, mia Ignacio, li skribas, ke...²*

II. LA SUPLEMENTOJ

La suplementoj estas malsamaj kaj malsame konstruiĝas laŭ tio, ĉu ili determinas aĵ-substantivon aŭ ad-substantivon (Vd. § 31). Tial ni studos aparte tiujn du kategoriojn.

SUPLEMENTOJ DE AĴ-SUBSTANTIVO

133

Ili povas akcepti du formojn: tiujn de prepozitiva substantivo aŭ de adjektivo.

I. Prepozitiva substantivo

La baza plej ĝenerala ligilo inter du substantivoj estas la prepozicio de. Sed, pro la multsignifeco de tiu prepozicio, estas rekomendinde uzi aliajn pli precizajn, ĉiufoje kiam eblas. Efektive, la suplementoj de aĵ-substantivo povas, helpe de diversaj prepozicioj, esprimi la sekvantajn rilatojn:

A. Suplemento de posedo. Ĝi indikas la havanton, al kiu la determinato apartenas:

a) kiel posedaĵo: *la libro de Petro; la palaco de la reĝo; li estas la fiero de sia patro;*

b) kiel alligitaĵo: *la ĉirkaŭaĵoj de la urbo; la valo de Rejno; la golfo de Helsinki; amiko de Petro;*

c) kiel parto, membro: *la limoj de la fila devo^Z; la okuloj de la bovo; la pinto de monto; la piedo de seĝo;*

d) kiel familiano: *ido de gloraj avoj; li estas preskaŭ mia frato, filo de kuzo de onklo de konato^Z;*

e) kiel kvalito aŭ stato: *supereco de E-o; la situacio de Eŭropo;*

f) kiel io atribuita aŭ rilatigita al la determinato laŭ speciala konsidero: *salajro de laboristo; prezo de pano; la kazo de Mauritius.* Ĉi tiu estas la suplemento de rilato.

La poseda suplemento havas ĉiam la prepozicion *de*.

Rim. Tie ĉi oni povas klasi ankaŭ la nom-suplementon (*de*): *dimanĉo de Pasko; tago de Sankta Neniama^Z; Placo de la Konkordo; strato de la Paco; hotelo de l' Suno^Z.* Ĉe firmonomoj kelkfoje oni trovas ĉe: *virinejo "ĉe la Azeno"^Z; hotelo ĉe l' Ora Cervo.* Firmo- kaj stratonomojn plej ofte oni esprimas per simpla substantiva epiteto (vd. § 132. 1. 2.).

B. Suplemento de origino. Ĝi indikas la devenon de la determinato, t.e.

a) la aŭtoron (*de*): *muziko de Mênil; Vortoj de Prof. Cart; romano de Forge; poemo de Baghy.*

Rim. I. Kelkfoje oni trovas el: *poemo el Heine;* tiam oni subkomprenas "el la verkoj de..."

b) la art- aŭ produktspecon (*de*): *majstraĵo de industrio kaj bongusto^Z; brila peco de poezio; miraklo de arkitekturo.*

c) la fonton, lokon, tempon de deveno (*el*): *libro el la germana lingvo; akvo el puto; robo el Parizo; miaj kolegoj el la oficejo^Z; krudaĵo el eksterlando; belaj rakontoj el trans la montoj^Z; kantisto el nordo; klientaro el altaj sferoj^Z; monumento el antikva tempo; kiraso el la mezepoko.*

Rim. II. Tie ĉi klasigas la kazo de la propraj nomoj, kiuj estas difinitaj per la loko aŭ de naskiĝo aŭ de loĝado: *Abraham el Baĥaraĥ^Z; la strabokula Aaron Hirschkuh el Homburgo ĉe Lahn^Z; Tomaso el Akvino, Francisko el Asizi.*

Sed ĉar en la okcidenta Eŭropo la nobeloj jam de longe uzis tian dirmanieron por distingi la membrojn de unu familio, la suplemento fariĝis parto de la propra nomo mem, kaj Zamenhof ordinare tradukas la nobelecan partikulon per *de*: *Francisko de Moor; Salomono de Caus; Bertrandon de Sotenville;* same: *la duko de Brunsvigo kaj la markgrafo de Brandenburgo; sinjoro de la Dandinière,* ktp.

d) la aron, kolektivon, kvanton, de kiu oni apartigas la determinaton (*el*): *unu el la plej belaj; ostoj el miaj ostoj kaj karno el mia karno^Z; kelkaj el la ĉefoj; granda amaso el la Izraelidoj^Z; restigi iom el la viando^Z.* Tio ĉi estas la suplemento de elektmaterialo.

Rim. III. Speco de ĉi lasta estas la suplemento de *distinga elekto*, kiu signos, ke la determinato estas la plej altranga en sia speco; oni ripetas la determinaton plurale kaj ĝin enkondukas per *de*: *Dio de la Dioj kaj Sinjoro de la Sinjoroj^z*; *la libro de la libroj* (la Biblio); *la Reĝo de la reĝoj*; aŭ per *super*: *miraklo super mirakloj*.

Alia speco estas la suplemento de *sendistinga elekto*, kiu signas, ke la determinato ne distingiĝas de la aliaj siaspecaj; oni uzas *inter*, *el inter*: *unu inter pluraj*; *nur unu homo el inter la homoj^z*. Sed *Z.* uzis ankaŭ simplan *el* en sia pseŭdonimo *Unuel* (t.e. unu el la popolo).

C. Suplemento de konsisto. Ĝi indikas la enhavon de la determinato, t.e.

a) la specon de ties konsisto (**de**): *bukedo de floroj*; *taĉmento de soldatoj*;

b) la materialon de la determinato (**el**): *statuo el marmoro*; *ponto el ŝtono*; *krono el oro*; *manĝo el verdaĵo^z*; *monero el arĝento*; *miksaĵo el timo kaj respekto*; *vesto el ŝaŭmo^z*; *korbo el salikbrancĵoj*; *vortaro el ĉirkaŭ mil vortoj^z*; *krono el floroj*.

Rim. I. Ĉe nedividita materialo oni uzas ĉiam *el*: ĉe dividita, plurale esprimita materialo oni uzas *de* por emfazi la specon; *bukedo de floroj*; kaj *el* por emfazi la elektitecon: *bukedo el floroj*.

c) la mezuron de la determinato (**de**): *jara salajro de tri mil kronoj^z*; *atingi la aĝon de okdek jaroj*; *vojo de tri tagoj en la dezerto^z*; *longo de tri metroj*.

Rim. II. Oni ne konfuzu ĉi tiun suplementon de mezuro kun la suplemento de mezuriteco (vd. sube sub *H.*).

d) la konsiston rigardatan kiel staton (tutecon, dividitecon, kvaliton); oni uzas *en*: *spegulo en tri pecoj* (rompita; *el tri pecoj* signifus, ke ĝi estas *farita el tri pecoj*); *Fundamenta Gramatiko en kvin lingvoj^z*; *mil spemiloj en bankbiletoj*; *la ekvivalento en oro*; *dro X. en sia propra persono*; *dramo en versoj*; *poemo en prozo*.

e) tion, kio esprimas la esencon de la determinato (**de**): *la miraklo de la reviviĝo* (la esenco de tiu miraklo estas la reviviĝo); *la masko de la homamo^z*; *sur la fono de ruĝetaj flamoj^z*; *la modo de grandaj ĉapeloj*; *la mielo de liaj juroj^z*; *la problemo de la senarmiĝo*.

Rim. III. La esenc-suplemento estas iom parenca al la nominacio (§ 132). Sed dum ĉe la nominacio la determinato estas simpla anoncorto antaŭ propra nomo, ĉe la esenc-suplemento ĝi montras ian specialan kvaliton, vidpunkton aŭ konsideron.

D. Suplemento de koncernateco. Ĝi indikas:

a) pli striktan specon de la okupiĝo de profesiulo (**de**): *dresisto de leonoj*; *profesoro de lingvoj*; *mastro de botoj*; *arkitekto de katedralo*; *hakanto de ligno*; *agenteo de libroj*; *elvokisto de spiritoj*; *instruisto de dancado*. Oni povas uzi ankaŭ **pri**, sed tio estas malpli kutima.

b) la specon de okupiĝo per la nomo de la okupito (**de**): *li helpis min en mia tasko de prezidanto*; *pozicio de sekretario*; *posteno de gardisto*.

c) la temon, pri kiu la determinato traktas (**pri**): *libro pri lingvoj*;

poemo pri amo; verko pri edukado. Oni uzas ankaŭ **de**, sed tio estas malpli preciza.

d) la destinitecon (**por**): *glaso por vino; ĉambro por eksperimentoj; domo por malriĉuloj.* Same bona estas **de**: *glaso de vino; komitato de kongreso.*

e) la agosferon (**ĉe**): *profesoro ĉe universitato; lernanto ĉe ŝuisto; raportisto ĉe gazeto; predikisto ĉe katedralo.* Oni povas uzi ankaŭ **de**, kaj oni devas ĝin uzi, se temas pri gvidanto, ĉefo: *redaktoro de gazeto; abato de monakejo.*

E. Suplemento de priskribo. Ĝi indikas:

a) la ligitcon de la determinato kun ago, stato (**de**): *kampo de batalo; la edzino forlasas la amikon de sia juneco^Z; la edzino de via juneco^Z; ŝtono de falpuŝiĝo^Z; tago de mizero^Z; tempo de malvarmo; tago de reveno^Z.*

b) la kvaliton de la determinato per la epiteto de abstrakta substantivo (**de**): *homo de granda talento; ĉevalo de blanka koloro; potoj kaj kruĉoj de plej diversaj formo kaj grando^B; floroj de nekompareblaodoro^B; floroj de sama valoro^Z; de nenatura grandeco^Z; la homo de eterna rido^Z.*

c) la kvaliton per la epiteto de substantivo montranta konsistparton de la determinato (**kun**): *cervo kun bonaj lumboj^Z; virino kun stumpa nazo; ĉevalo kun granda kapo; seĝo kun rompita piedo.*

d) la veston, kovritecon (**en**): *homo en frako; la virino en la atlasoj^Z; la ondoj en vesto el ŝaŭmo^Z.*

e) la kunecon (**kun**) kaj senecon (**sen**): *akuzativo kun infinitivo; akuza-tivo sen prepozicio.*

f) aliajn cirkonstancojn per diversaj prepozicioj, laŭ la senco: *kuracisto malgraŭ volo; respondeco antaŭ Dio; afero ekster dubo; rimedo kontraŭ veneno; medikamento kontraŭ febro; sekreto sub sep sigeloj; novelo sub la titolo Albina^Z; vidvino post oficisto^Z.*

F. Suplemento de loko.

a) la pozicion oni montras per la diversaj lokaj prepozicioj: *la arbo antaŭ la dometo; la batalo apud (ĉe) Solferino; Frankforto sur Majno^Z; la ringo ĉirkaŭ via fingro; la kongreso en Bulonjo; la aŭskultanto post la pordo; la ĉambro sub la tegmento; du gradoj super la nulo; budo sur la strato; ho la juvelo sur la lotuso!; la vojo tra la parko; la kampo trans la rivero; la arbo cis (maltrans) la roko.*

b) la ĝisendiĝon montras **ĝis**: *la vojo ĝis la rivero.*

c) la direkton montras **al**: *la vojo al Versajlo; la vagonaro al Berlino; la ekspedicio al la suda poluso; la fenestro al la strato (rigardanta al).*

d) la devenpunkton montras **el**: *la vojo el Parizo.*

Rim. La lokon oni povas esprimi ankaŭ per **de** anstataŭ **en**: *la kongreso de Bulonjo.* Ĝin oni uzas precipe, kiam ankaŭ la determinato estas lok-adjekto: *tio okazis en Coan de Egiptujo^Z.*

G. Suplemento de tempo.

a) la aktualan tempon oni esprimas per **en**: *gast' en tempo malĝusta estas ŝtono sur brusto²; amiko en malĝojaj tagoj*; sed oni trovas ankaŭ **de**: *la edzino forlasas la amikon de sia juneco (priskriba suplemento, necesa, ĉar en sia juneco difinus la tempon de la forlaso)*.

b) la antaŭ- kaj posttempecon esprimas **post** kaj **antaŭ**: *la dimanĉo antaŭ novjaro; en la trideka jaro post Jesu-Kristo; la periodo post la milito*.

c) la komencan tempo-limon esprimas **ekde**: *la tagoj ekde Kristnasko*; la finan esprimas **ĝis**: *en la tempo ĝis la ferio*.

H. Suplemento de mezuriteco. Gi indikas ion mezuratan de la determinato; la prepozicio estas da.

Rim. I. Oni ne konfuzu ĝin kun la suplemento de mezuro, kiu mezuras la determinaton (vd. supre sub C. c.).

Oni devas atenti pri tio, ke la mezuradon devas efektivigi la determinato mem. Se la suplemento estas difinita, do mezurita, ĝi ne estas plu suplemento de mezuriteco (**da**), ĉar ne la determinato mezuras ĝin. Tiaokaze do la suplemento indikas aŭ ion, kies parto estas la determinato (**de**, vd. A. c.) aŭ la specon (**de**, vd. C. a.) aŭ la elektmaterialon (**el**, vd. B. d.) de la determinato.

Da, proprasence, do servas por rilatigi substantivojn aŭ kvazaŭsubstantivojn, kiuj esprimas pli malpli difinitan kvanton, nombron, grandon, pezon, kun ilia suplemento esprimanta la *nedifinitan* tuton, el kiu oni prenas tiun kvanton, nombron, grandon ktp. El tiu difino sekvas, ke la uzo de **da** estas limigita per du kondiĉoj: 1. la antaŭa substantivo devas havi signifon de mezuro; 2. la posta substantivo (suplemento) devas esti *nepre nedifinita*.

1. la mezuro povas esti preciza, aŭ pro la signifo mem de la vorto: *semajno, monato, jaro, dekduo, miliono, litro, kilogramo, kubmetro* ktp. (ĝi povas esti eĉ simpla numeralo: *da ĉevaloj ili havis 236²*; jen kurioza ekzemplo, en kiu la sama vorto havas unue mezuran valoron kaj poste valoron de unuo: *dek miloj da dek miloj staris antaŭ li²*); aŭ pro la kunteksto: *la difinitan nombron da brikoj liveru²*.

Ĝi povas esti proksimuma: *plenmano, glaso, botelo, paĝo, guto, floko* ktp.

Ĝi povas esti malpreciza, kaj montri:

aŭ malgrandan kvanton: *iom, tiom, neniom, kelke, pli; grupo, bando, peco, parto* ktp; *spaco da tero²; jaroj da vivo²; karavano da Ismaelidoj²; ligaĵo da mono²; 3 taĉmentoj da ekstermantoj²; bukedo da rozoj; tavolo da fojno; laĉo da koraletoj²; sistemo da signoj²; sen ia ombro da dubo²*;

aŭ grandan kvanton: *aro, amaso, multe, tro* ktp.; *multo da amikoj²; svarmo da veturiloj²; nubo da korvoj; torentoj da lumo, da larvoj²; hajlo da kugloj²; maro da mizeroj²*.

Laŭ tiuj ekzemploj oni vidas, ke multaj vortoj, laŭokaze, povas ricevi signifon de mezuro; oni povas uzi *da* nur, se tian signifon ili akceptas en la koncerna frazo. Por rekoni tion, oni povas meti antaŭ la duba vorto la demandon *kiom multe?* Se la vorto respondas al la demando, oni povas uzi *da* (rezerve de la dua kondiĉo, kompreneble). Ekz-e: *fone-tiko estas parto – gramatiko: ĉu de aŭ da?* Ni demandu: *kiom multe da gramatiko?* Neebla respondo, do *de!* *Donu al mi pecon – pano;* ni demandu: *kiom multe da pano?* – *Pecon!* Taŭga respondo, do *da!* Inter grupo de soldatoj kaj grupo da soldatoj estas do tiu diferenco, ke la dua respondas la demandon: *kiom multe da soldatoj?*, dum la unua montras la konsiston, la kvaliton kaj respondas la demandon: *kiaspeca tiu grupo?* Alidire, de metas la insiston sur la unuan vorton de la komplekso kaj *da* metas ĝin sur la duan: *vico de klientoj* elvokas precipe bildon de vico (konsistanta el klientoj), dum *vico da klientoj* elvokas precipe bildon de la klientoj (aranĝitaj en vico).

Rim. II. Ne uzu *da* post *manko, perdo*; post *speco* oni povas uzi ĝin nur ĉe tre klara signifo de mezuro: *tamen ne ĉiujn specojn da fiŝoj oni povas konservi en tiu maniero*^K. Plej bone estas uzi *de* aŭ *el* post tiu vorto.

2. Antaŭ difinita substantivo oni neniam uzas *da*. Pli precize, oni ne uzas *da* antaŭ:

a) la artikolo (*peco da pano; peco de la pano*);

b) ĉiu aŭ ĉiuj, tuta (*kelke da soldatoj; nur kelkaj el ĉiuj soldatoj*);

c) la montraj, personaj, posedaj kaj nombraj pronomoj aŭ adjektivoj (*600 frankoj da rento – rento de 600 frankoj; dek jaroj da vivo – dek jaroj de sia vivo*).

Sed substantivo povas esti difinita ankaŭ per si mem, se ĝi montras tute precizan kvanton: tio estas la okazo pri ĉiuj nomoj de unuo: *horo, tago, monato, jaro, franko, ŝilingo, marko, metro, centimetro, kilometro, kilogramo* ktp, kiam ili estas uzataj singulare (ĉar plurale, ili esprimas ne devige precize difinitan kvanton: *li kuris kelke da metroj*). Antaŭ ili oni do ne uzos *da*: *parto de jaro* (sed: *parto da tempo*).

Tiu signifo de mezur-unuo povas esti akirita eĉ de komunsignifa substantivo, se ĝi iĝas suplemento de frakci-nomo: ĉar per tio mem, ke oni precizigas frakcion, oni precizigas ankaŭ la tuton, la unuon, el kiu oni detranĉas parton. Do post *duono, triono* ktp oni ĉiam devas uzi *de* kaj ne *da*: *mi legis duonon de paĝo en unu horo; li aĉetis kvaronon de torto* – krom, kompreneble, se la substantivo montras materialon nerigard-eblan kiel unuo: *la metalo konsistas el du trionoj da oro kaj unu da arĝento*. Kelkaj atribuas la saman valoron al *parto, frakcio, sekcio* kaj post tiuj vortoj uzas nur *de*.

La supraj distingoj kaj malpermesoj, kiujn difinis iom post iom la uzado de la plej bonaj aŭtoroj, liveras praktikan, tute certan regulon kaj ĉiam obeindan. Kompreneble, en la komencaj jaroj de nia literaturo, la uzado estis malpli precize limigita, kaj de tio oni povas trovi ĉe Z. aŭ en la F.K. kelkajn postsignojn:

aa) Z. uzas da antaŭ personalo: *la maljunulino kolektis berojn kaj donis al ŝi iom da ili*; *Moseo diris al ili* (pri la manao): *nenui restigu iom da ĝi ĝis la mateno*. Sed ankaŭ en tiaj okazoj *iom el ili kaj iom el ĝi* ŝajnas nun pli bonaj esprimoj.

bb) En la F.K. oni plurfoje trovas da post frakci-nomo; tiun uzon Z. konservis en la okazo, kiam la mezurvorto estas kunmetita el entjera kaj el frakcia nomo: *du metroj kostas kvar kaj duonon da frankoj*; *ĥomero kaj duono da hordeo*. Sed la ĝustan solvon de tia malfacilaĵo ni jam vidis § 87 D.

Rim. III. La suplemento povas esti substantive uzata adjektivo (§ 74 a): *multaj obeis tiun ĉi vokon, ne vidante, kiom da ridinda estas en ĝi²; multon da bona kaj feliĉa mi ĝuis en vi, hejma domo!*²

Rim. IV. En kelkaj okazoj la da-suplemento antaŭas la mezurvorton: *mi faros, ke da vidvinoj ĉe ili estos pli ol da sablo ĉe la maro²* (= pli da vidvinoj); en la dua duono de la frazo eĉ tute mankas la mezurvorto (*ol* efektive anstataŭas *ol kiom*). Tamen la mezurvorto devas esti ĉiam almenaŭ elipse subkomprenata: oni do ne povas diri: *trinki da teo aŭ manĝi da pano*.

I. *Suplemento de distribuo*. Ĝi indikas, el kiom da unuoj, elementoj, aŭ el kia mezurita kvanto konsistas ĉiu unuopo de plurajo esprimita per la suplementita substantivo. Ĝia prepozicio estas *po*. La suplementita substantivo kompreneble devas esti ĉiam plurala.

La senco de la suplementa *po* do estas: "konsistantaj ĉiu egale el..." Ekz-e: *trupoj po cent soldatoj* (trupoj, el kiuj ĉiu konsistas egale el 100 soldatoj); *du premioj po cent frankoj*; *du bareloj da vino po cent litroj*; *kvin pecoj da drapo po tri metroj*; *dek bankbiletoj po 100 florenoj*. Ankaŭ la prezo, la kosto povas esti esprimata tiamaniere: *mi fumis cigaredojn po dudek kopekoj* (ĉiu cigaredo kostis tiom); *li estis dungita por ok horoj po 20 spesmiloj* (por ĉiu horo li ricevis 20 sm.).

Rim. Kiam temas pri aĉeto aŭ vendo, estas pli konsilinde meti *por* antaŭ *po*: *mi aĉetis tri librojn por po mil frankoj*. Tiam *po mil* fariĝas po-esprimo (vd. § 87 F). Kp. ankoraŭ § 207 B.

II. Adjektiva suplemento.

134

Multaj el la supre analizitaj suplementoj povas, dank'al la interŝangebleco de la lingveroj, akcepti la adjektivan formon. Sed tio estas nur ekstera formo, kiu ne ŝanĝas la sintaksan valoron de la suplemento; cetere ili akordiĝas tute same kiel la adjektivaj epitetoj (§ 128). Adjektive povas esti esprimataj (la literoj rilatas al tiuj de la § 133):

A. P o s e d o: *la reĝa palaco*; *la urba ĉirkaujaĵo*; *bovaj okuloj*; *la Eŭropa situacio*; *laborista salajro*.

Rim. I. Ofte oni uzas kunmeton: *urb-gardeno*; *mont-piedo*; *pan-prezo*. Ne povas esti esprimata adjektive, nek kunmete, la familia rilato, ĉar per tiaj formoj oni ne povas esprimi la posedan adjektivon: *frata verko* ne povas montri la verkon de mia, via ktp frato. Nur ĉe kelkaj esprimoj la kunteksto mem kompletigas tian mankon: *kaŝi sin malantaŭ la patrinaj jupoj*; *reveni al la patra domo*. Sed *patrolando* estas io multe malpli difinita, ol la lando de mia patro ktp.

B. Origino: arkitektura miraklo; pariza robo; granda izraelida amaso.

Rim. II. La aŭtoron oni esprimas prefere per kunmeto: *Baghy-romano*. Ne povas esti adjektive aŭ kunmete esprimata la distinga kaj sendistinga elekto.

C. Konsisto: flora bukedo; marmora statuo; tritaga vojo; trimetra longo; kvinlingva libro; ora ekvivalento; versa dramo; ruĝflama fono; homama masko.

Rim. III. La speco kaj materialo ofte estas esprimataj per kunmeto, eĉ prefere: *florbukedo*; *marmorstatuo*. La aliaj konsist-suplementoj ne toleras esprimon per kunmeto.

D. Koncernateco: universitata profesoro; sekretaria pozicio; ama poemo; priama poemo; vina glaso; kongresa komitato.

Rim. IV. Ne povas esti adjektive esprimata la suplemento de okupiĝo (*D. a.*). Sed ĉiujn koncernsuplementojn oni povas esprimi per kunmeto: *lignohakanto*; *danc-instruisto*; *am-poemo*; *vin-glaso*, krom la suplemento de la okupito (*D. b.*).

E. Priskribo: batala kampo; grandtalenta homo; bonlumba cervo; senprepozicia akuzativo; frakvesta homo; eksterduba afero; kontraŭ-febra medikamento; malgraŭvola kuracisto.

Rim. V. La ligiteco (*E. a.*) ofte estas esprimata per kunmeto: *batal-kampo*; *liber-tempo*. La ceteraj priskriboj ne toleras esprimon per kunmeto.

F. Lokoj: antaŭdoma arbo; Bulonja kongreso; subtegmenta ĉambro; strata aŭ surstrata budo; transkampa rivero; cisrivera kampo; ĝisrivera kampo; strata fenestro; sudpolusa ekspedicio.

G. Tempo: malĝustatempa gasto; postpaska dimanĉo; ĝisdimanĉaj tagoj.

H. Mezuriteco: Ĝi neniam povas esti esprimata adjektive, nek kunmete.

I. Distribuoj: Ĝi povas esti esprimata adjektive, kvankam tio estas tute ne kutima: *fumi podudekkopekajn cigaredojn*.

El la supraj ekzemploj oni povas tiri la jenajn regulojn:

aa) Se la suplemento estas enkondukita per **de**, **el**, **por**, **en** aŭ neloka **ĉe**, ĝi transformiĝas en adjektivan nudan: *pastra domo*, *poezia verko* (de); *pariza robo*, *ora krono* (el); *vina glaso*, *kongresa komitato* (por); *universitata profesoro* (ĉe); *Bulonja kongreso*, *Maja festo* (en);

bb) Se la suplemento povas esti esprimata *ankaŭ* per **de**, oni povas uzi nudan adjektivan, sed ankaŭ adjektivan kun prefiksoida prepozicio: *ama* aŭ *priama poemo*; *strata* aŭ *surstrata kiosko*; *brusta* aŭ *ĉebrusta poŝo*. Sed ĉe propraj nomoj oni uzas nur la nudan adjektivan formon en tia okazo: *la Solferina batalo*;

cc) Se la suplemento ne povas esti esprimata per **de**, oni uzas prefiksoida la prepozicion: *antaŭpaska dimanĉo*, *senprepozicia infinitivo*; *malgraŭvola kuracisto*, *subsigela sekreto*. Tamen, **kun** estas uzata nur en la sola vorto *kuntara*, cetere, oni uzas aŭ nudan adjektivan (*folia branĉo*), aŭ kunmeton kun **hava**: *folihava*. Ĉe la suplemento de kovriteco oni

uzas **-vesta**, aŭ **-kovrita**: *frakvesta homo*; *ŝaŭmkovrita ĉevalo*;
dd) Se la suplemento havas epiteton, ĝi povas esti kuntirita kun ĝi en adjektivan vortkunmeton: *grandtalenta homo*, *tritaga vojo*. Sed se la suplemento ne povas esti esprimita per simpla adjektivo sen prefiksoido oni evitas la adjektivan formon; ekzemple oni ne diras *senbonkonscienca homo* (sed ja: *malbonkonscienca*). Sola escepto estas, se la kunmeto estas tiel kutima, ke ĝi ŝajnas kvazaŭ radikvorto: *senhuffera ĉevalo*. Kun estas esprimita per adjektivo nuda: *grandĉapela homo*.

Krome, oni devas atenti pri tio, ke la adjektiva formo havas ne nur la signifon de rilato, sed ankaŭ tiun de kvalito. Do ĉe abstraktaj substantivoj oni devas esplori la adjektivon el tiu ĉi vidpunkto, ĉu la senco restis sensanĝa: *limoj de devo* ne estas transformebla en *devaj limoj*, ĉar ĉi lasta havas alian sencion.

Ankaŭ tion oni devas memori, ke la adjektiva formo ne toleras difinon per la artikolo. *La malsano de la patro* do ne estas transformebla sen ŝanĝo de la senco: *la patro malsano* estas malsano, kiu povas karakterizi ĉiujn patrojn. Kompreneble ankaŭ la suplemento determinata per vorto ne estas transformebla; ekz-e: *la arbo antaŭ la domo de mia najbaro*.

SUPLEMENTOJ DE AD-SUBSTANTIVO

135

Ili akceptas kvin formojn: 1. prepozitiva substantivo; 2. akuzativa substantivo; 3. adjektivo; 4. infinitivo; 5. propozicio. Kvankam pro la libera ludo de la lingvelementoj, ĉiu el tiuj kvin formoj povas ofte ŝanĝiĝi en alian, ni studos ilin aparte.

I. Prepozitiva suplemento.

La ad-substantivo estas nur substantiva formo de verbo. La du ideoj, kiujn oni plejofte devas esprimi suplemente de ĝi, estas do la ideo pri subjekto kaj tiu pri objekto. Se el la frazo: "*la kato manĝis la raton*" ni faras substantivan vortgrupon, ni devas esprimi iel la plenuminton de la manĝado kaj la suferinton de tiu ago, t.e. la subjektan kaj la objektan suplementojn.

La malfeliĉo estas, ke la Fundamento proponas la saman prepozicion de por ambaŭ funkcioj: la subjekta suplemento devas esti esprimita per **de**, ĉar la sesa regulo de la Fundamenta Gramatiko diras, ke "la prepozicio ĉe la pasivo estas **de**" – kaj la rilato inter ad-substantivo kaj ĝia subjekta suplemento estas tute sama, kiel tiu inter la pasiva verbo kaj ĝia agant-adjekto; la objekta suplemento, aliflanke, devas esti esprimita per **de**, ĉar, kiel ni vidis, tiu prepozicio estas la ĉefa ligilo inter du substantivoj. El la supra ekzempla frazo, oni devus do tiri: *la manĝado de la kato de la rato*. Kvankam en kelkaj lingvoj ekzistas sama konfuzo (*pro ueteribus Helvetiorum iniuriis populi Romani* – skribis Caesar, "De Bello Gallico", 1,30,2 = *pro la malnovaj ofendoj de la Helvetoj*

de la roma popolo; Catilinae spem consulatus adipiscendi – skribis Cicero, "Pro Murena", 26,53 = *la espero de Katilino de ricevota konsuleco*), tamen tia dirmaniero estas tro dubsenca, ol ke oni povus akcepti ĝin – eĉ formulante la regulon, ke oni esprimu ĉiam la subjektan suplementon antaŭ la objekta.

Por solvi tiun malfacilon eblis du rimedoj: esprimi alie aŭ la subjektan aŭ la objektan suplementon. Pro la supre citita regulo de la Fundamento, oni komence elektis la duan vojon.

a) La plej simplan manieron esprimi pli klare la objektan suplementon liveris la analogio: kial ĉe la propozicia formo ne okazas konfuzo inter subjekto kaj objekto? Pro la ekzisto de la akuzativo: *la kato la raton manĝas*; oni estis do alkondukita tute nature al uzado de la sama kazo post ag-substantivo: *la manĝado la raton de la kato*. Tiun dirmanieron plurfoje uzis Z., eĉ en siaj lastaj verkoj: *la Ligo havas la celon zorgadi pri la enkondukado en la tuta mondo unu neŭtralan lingvon*²; *la konstanta alkalkulado sin al ia speciala gento*² (1915) – sed preskaŭ ĉie la objekta suplemento estas persona pronomo kaj la subjekta ne estas esprimita. Cetere, Z. ne estis imitata sur tiu ĉi punkto, kaj frazoj, kiel la supre cititaj, ŝajnas nur eksterordinaraj Z-ismoj. La kaŭzo de tiu malsukceso estas, ke tia konstruo de akuzativo dependanta de substantivo estas kontraŭa al la spirito de la hindeŭropaj lingvoj, kiuj zorge apartigas la sistemon de la substantivo disde tiu de la verbo.

Rim. Solvon pli konforman al la spirito de nia lingvo prezentus la uzado de akuzativo post la prepozicio *de*, analoge al la uzado de akuzativ-prepozitivo por montri la celon (§ 192): *la manĝo de la raton*; sed ĝis nun ĝi estis nur proponita, ne praktikata.

b) Ĉar ne ekzistas taŭga rimedo por esprimi la objektan suplementon, oni provis doni al tiu suplemento formon de adjekto anstataŭ objekto. Analoge al la duobla konstruo de kelkaj verboj (*helpi iun* – *helpi al iu*; vd. § 177.), oni anstataŭigis *de* per alia pli preciza prepozicio. Oni tiel uzis:

abono (al io), abomeno (pri io), admiro (al iu pri io), admono (al iu por io), adoro, amo (al iu), aludo (al io), amuzo (al, por iu), aplaŭdo (al iu), arogo (pri io), argumentado (pri io), aspiro (al, je io), atako, atenco (al, kontraŭ iu), atento (pri iu, pri io), averto (al iu pri io), babilado, baloto (pri io), barado (al io), bedaŭro (pri io), beno (al iu), bezono (pri io), bombardado (al io), celo (al io), ĉaso (je io), danko (al iu pri io), defendo (kontraŭ io), deklaro (pri io), demando (al iu pri io), denunco (al iu kontraŭ iu pri io), determino (pri io), deziro (je, pri io), difino, dispono (pri io), distro (al iu), dubado (pri io), eduko (al, por iu), envio (al iu pri io), esploro (pri io), estimo, favorado, fino, flato, flego (al iu, io), forgeso (pri io), frapo (al io), garantiado (pri io), gratulo (al iu pri io), grimrado (al io, sur ion), ĝojo (pri io), helpo (al iu pri io), hezito, hipokrito, hontado (pri io), ignoro (al iu), ilustrado (por io), incito (al io), indigno (pri, pro io), indiko (pri io), indulgo, influo, insido (al iu),

instruo (al iu, pri io), invado (al io), ĵuro (pri io), kalkulo (pri, je io), kalumnio (kontraŭ iu pri io), karakterizo (pri io), klopodado (por, je, pri io), komenco (al io), komentario (pri io), kompenso (por io), kompreno, kono (pri io), konsento (kun iu pri io), komuniko (al iu pri io), kondamno (al iu), konfeso (pri io), konfido, konfirmo, konsolo (al iu pri io), kontribuo (al io per io), kontrolo (pri io; pri iu koncerne ion), kotizo (por io per io), postkuro (al iu), laŭdo (pri iu pro io), legitimo (por iu), medito, memoro, mencio (pri io), minaco (al iu), miro (pri io), mokado (pri io; pri iu pro io), nostalgio (al, pri, je io), nutro (por, al iu), obeo (al io; al iu en io), observo (pri io), ofendo (al iu), okupo (por iu), pardono (al iu pri io), parolo (pri io), penado (por, pri io), ornamo (por io) penetrado (en ion), penso (pri io; pri, al iu), perfido (kontraŭ iu pri io), persekuto (al iu), peto (al iu pri io), plendo (pri io), postulo (pri io), prelego (pri io), premo (sur io), preparado, pretendado, propono (pri io), protekto (al iu), protesto (pri, kontraŭ io), provo, pruvo (pri io), rakonto, raporto, recenzo (pri io), regado (super iu), renkonto (al, kun iu), revo, rezigno (pri io), rifuzo (al iu pri io), scio, sekretado, sento, serĉo (pri io), soifado (je, pri io), studo (pri io), sufero (je io), suspekto (pri io), ŝato (al io), ŝirmo (al io), ŝmiro (sur ion per io), ŝparo (pri io), ŝtopo (al io per io), taksado (pri io), timo (al, pro iu, io; pri iu, io), tolero, traktado (pri io), trompo, turmentado (al iu), venko (super iu), vizito, voko (al iu), zorgado (pri iu, io).

En la supraj kazoj la de-suplemento, metita antaŭen, signas la subjekton de la ago: *mokado de la knaboj pri la maljunulo; la kontrolo de la inspektoro pri la laboristoj koncerne ilian akuratecon; la bedaŭro de la maljunulino pri sia juneco.*

137

Sed la supre indikitaj rimedoj ne estas ĉiam aplikeblaj.

Ekzistas verbo-substantivoj, kiuj ne toleras suplementon alian ol de-prepozitivon, por montri la rektan objekton de la ago. Tiaj estas la substantivoj devenintaj el **p r o d u k t o - v e r b o j** (*produktado, fabrikado, kreo, farado, desegno, pentrado, skribado*). Oni ne povas diri: *skribado al letero, kreado al mondo, pentrado al bildo, verkado al libro*, ĉar al tie ĉi ŝajnas havi la sencon **aldone al**. Tiaj estas krome la substantivoj devenintaj el la verboj: *havi, posedi, heredi, gajni, perdi, glui, akiri, aneksi, trovi, manĝi, trinki, legi, gluti, frandi* ktp., ĉe kiuj la rektan komplementon, sen dubsenceco, povas signi sole de-suplemento.

Ekzistas radikoj de verboj, kiuj havas samtempe du objektojn, unu rektan kaj alian nerektran, kiel *dediĉi ion al iu* (vd. § 177). Nu, sub la substantiva formo, la nereakta objekto konservas sian prepozicion **al**, kaj oni ne povas, sen plena konfuzo, esprimi per la sama prepozicio ankaŭ la rektan objekton. Se oni volas substantivigi la frazon: *la pastro dediĉis la preĝejon al Sankta Miĥaelo*, oni tuj sentas la bezonon de aparta esprimilo por la subjekta suplemento: *la dediĉo de la preĝejo al Sankta Miĥaelo... la pastro* ĉar dirmaniero kiel *la dediĉo de la pastro al la preĝejo* estus nenatura, kaj kiu elportus: *la dediĉo de la pastro al*

la preĝejo al Sankta Miĥaelo?

Eĉ kun la radikoj montritaj sub § 136 oni sentas la neceson de tia esprimilo en du okazoj.

1. kiam pro la ekzisto de alroĉita rilativa propozicio, oni devas meti la subjektan suplementon post la objekta: *la kontrolo pri la gvidantoj de tiuj gvidatoj, kiuj estas tiel ofte tromprabitaj* – ĉar tiam oni nature emas dependigi la subjektan suplementon de la objekta (= *la gvidantoj de tiuj gvidatoj*), kaj ne de la ĉefsubstantivo (= *la kontrolo de la gvidatoj pri la gvidantoj*);

2. kiam la subjekta suplemento estas sole esprimita, ĉar oni neniam scias, ĉu la prepozicio **de** havas tiam la subjektan aŭ la objektan signifon: *la instruo de la apostoloj* povas esti jen la instruo (ricevita) de la apostoloj (objekta suplemento), jen la instruo (disdonata) de la apostoloj (subjekta suplemento) – kaj oni tuj komprenas, ke povas kuŝi kelke grava diferenco inter tiuj du ideoj! Kiam ni parolas pri kondamno de la juĝisto, povas esti utile scii, ĉu tiu juĝisto estas kondamninta aŭ kondamnita; ktp.

Pro tiuj motivoj oni estis alkondukata serĉi anstataŭaĵon ankaŭ por la subjekt-signifa **de**. Apenaŭ menciindaj estas la mort-naskitaj proponoj de *par*, *da*, *baj* ktp.; ankaŭ la uzado de **per** en tiu signifo estas eraro, ĉar **per** montras la ilon, la helpanton, ne la aganton.

Poste **Z.** iniciatis la uzon de **flanke de** por tiu funkcio; sed, ĉar tiu prepoziciaĵo povas ankoraŭ signifi "aparte de" (t.e. preskaŭ la malon), la solvo ankoraŭ ne estis kontentiga. Sed ĝi montris la vojon, kaj fine, en 1926, Grosjean-Maupin konvinkis la SAT-gazetojn sisteme uzi, en tiu okazo, **fare de**, kiu enradikiĝis en la laborista literaturo: *la ekspluatado de la homo fare de la homo; dum vizito al nia sidejo fare de tiuj fremdaj kolegoj*.

Dank'al la duobla anstataŭigo de **de** jen per al (**pri** ktp.), jen per **fare de**, oni povas de nun eviti ĉian konfuzon kaj distingi ekz-e *la kondamno al la juĝisto* disde *la kondamno fare de la juĝisto*.

Rim. Apud **fare de** oni jam uzis la formon **far'** de, analogan al **dank'** al; oni ankaŭ renkontas eĉ la prepozician uzon de la radikoj **far**, analoge al **per** apud **pere de**: tio liveras tre oportunan formon por la subjekta suplemento: *la dediĉo de la preĝejo al Sankta Miĥaelo far nia pastro*.

Se ekzistas nur unu suplemento, oni povas distingi jene:

1. Ekzistas multaj verboj, kiuj povas havi nur personan subjekton kaj aĵan objekton; ĉe ili la signifo de la suplemento estas ĉiam evidenta: *skribo, konstruo, diro, trinko, gluto, studo, lerno, provo, pruvo, scio, lego*, ktp. *de iu* (subjekta) aŭ *de io* (objekta).

2. Ĉe la alternsubjektaj verboj (vd. § 322. 2. C.), se ili ne apartenas al la ĉi-supra kategorio, oni esprimas per **de** la objekton: *baro de korto; amuzo de gastoj*; per **per** la aĵan subjekton: *baro per branĉoj; amuzo per kantoj*; dum la personan subjekton estas konsilinde esprimi per **fare de**: *amuzo fare de kantistoj*.

3. Ĉe la verboj montrantaj sintenon estas konsilinde esprimi la objektan suplementon ĉiam per al kaj rezervi de por la subjekta suplemento: *amo, ŝato, malamo, abomeno* ktp. *al iu* (objekta) aŭ *de iu* (subjekta). Sed la aĵan objekton oni povas esprimi ankaŭ per de, ĉar la subjekto de tia ago povas esti nur persono: *abomeno de klaĉoj*.

4. Ĉe la spiritfunkciaj verboj la afero estas la sama, sed anstataŭ al oni montru la objekton per pri: *penso, revo, kono pri iu* (objekta) aŭ *de iu* (subjekta). Aĵa objekto estas esprimebla per de: *penso de morto*.

5. Ĉe la aliaj verboj, kiuj povas havi personajn subjekton kaj objekton; la de-suplemento estas komprenata precipe kiel objekta: *la murdo de Petro* (= Petro estis murdita); *la akcepto de la delegitoj* (= la delegitoj estas akceptitaj). Do, ĉe ili la subjektan suplementon estas konsilinde esprimi ĉiam per fare de (far): *la kondamno fare de la juĝisto; la murdo far' de Petro; la akcepto far la urbestro*.

Apud tiuj du suplementoj, subjekta kaj objekta, oni povas trovi sub suplementa formo ankaŭ ĉiajn adjektojn, kiujn oni trovas apud la responda verbo: oni konsultu nur la § 182 ĝis 212.

Sufiĉos noti ĉi tie, ke, kontraste al la aĵ-substantivoj, la ad-substantivoj:

1. ne povas sekvigi suplementon esprimantan: materion, posedon, priskribon, mezuritecon; 2. povas, plie, sekvigi suplementon esprimantan: almovon, formovon, kaŭzon, rimedon kaj manieron: *mia foriro de Parizo al provinco, pro monmanko, per vagonaro, laŭ plej rapida vojo*.

139

II. Akuzativa suplemento.

Ne temas nun pri la escepta akuzativa objekto, kiun ni aludis en § 135.

1. a. Male, oni trovas, tute regule, akuzativan suplementon post ad-substantivo por montri la almovon, la celon, la direkton al iu punkto; tio estas analoga al la uzo de akuzativa direkto-adjekto (vd. § 190. 3.). Tiu akuzativo povas esti substantiva aŭ adverba: *mia vojaĝo Hispanujon; dum la irado hejmen²*.

Oni uzas tiun akuzativan suplementon nur post substantivoj, kies radiko mem signifas movon: *iro, alpaŝo, flugo, flugado, fuĝo, grimpado, invado, kuro, almarŝo, proksimiĝo, reveno, veturo, vojaĝo* ktp. La adverba akuzativo estas la plej ofte uzata formo, pro la jam rimarkita malinklino al la uzo de akuzativa suplemento post substantivo; tamen, oni ĝenerale preferas la substantivan formon ĉe la landnomoj.

140

III. Adjektiva suplemento.

Multaj el la supre montritaj suplementoj, povas, kiel la aĵ-substantivoj, ricevi la adjektivan formon. Adjektive povas esti esprimataj:

a) sen prefikso:

la subjekta suplemento: *pastra beno*;

la maniera suplemento: *fervoja veturo, mara vojaĝo*.

b) kun prefikso, aŭ per vortkunmeto:

preskaŭ ĉiuj aliaj suplementoj, ankaŭ la maniera: *pervoĉdona decido²*.

Adjektive ne povas esti esprimataj la objekta suplemento, kaj la cela suplemento.

Rim. En unu okazo tamen povas esti esprimata la objekta suplemento: ĉe la personaj pronom-adjektivoj. Sed ĉar tiam la danĝeroj de konfuzo estas grandaj, oni uzu tiun turnon nur, kiam la signifo de la ad-substantivo ne allasas dubon: *la artikolo...; ĝia uzado estas la sama...²* ktp. (= oni uzas ĝin). Sed ekz-e: *ŝia murdo* estus konfuza, ĉar tio povus egale signifi aŭ ke ŝi murdis, aŭ ke ŝi estis murdita.

La uzebleco de la adjektiva suplemento multe levas la oportunecon de la lingvo. Ĉar la objekta suplemento ne povas esti tiel esprimita, oni, per tiu maniero, povas helpi pri la konfuzo inter tiu kaj la subjekta suplemento: anstataŭ *la nutrado de la infanoj fare de la patrino* oni povas pli elegante diri: *la patrina nutrado de la infano*. Tia konstruo ne ĉiam eblas, sed, kiam oni povas ĝin uzi, ĝi estas uzinda.

La adjektiva suplemento ebligas ankaŭ tre grandan koncizon en kelkaj okazoj; anstataŭ ekz-e: *oni punas per morto tiujn, kiuj fuĝas al eksterlando per aeroplano*, estas pli draste diri: *punata per morto estas la aeroplana fuĝo eksterlanden*.

IV. Infinitiva suplemento.

Kiam la suplemento de ad-substantivo estas sence verba, ĝi povas alpreni formon infinitivan anstataŭ substantiva. Ekz-e, anstataŭ *la deziro je regado super la homoj*, oni povas diri: *la deziro regi super la homoj*. Ties eblon klarigas, ke en la hindeŭropaj lingvoj la infinitivo origine estas la substantiva formo de la verbo.

Tamen, en Esp-o, la uzo de la suplementa infinitivo estas limigita. La kaŭzo estas, ke la infinitivo ne havas bazan ligilon: ĝi ligiĝas ĉiam senpere. Oni do povas uzi infinitivan suplementon nur tiaokaze, se la senca rilato inter la infinitivo kaj la suplementita substantivo estas klara per si mem, sen-prepozicia klarigilo.

Rim. El la malmultaj prepozicioj, kiuj en Esp-o povas enkonduki infinitivon (vd. § 117), sole *por* povus esti uzebla kiel ligilo de suplemento; sed ankaŭ *por* povas tiel funkcii nur tiam, kiam ĝi staras antaŭ infinitivo, kies ago havas saman subjekton kun la predikata ago. Kelkfoje oni trovas ĉe Z. tiajn absolutajn *por*: *la preteco por sin oferi; estas tempo por montri* ktp.: ĉi tiuj esprimoj ŝajnas pli ĝustaj sen *por*.

Pro la ĉi-supre montrita motivo, la infinitivan suplementon oni povas uzi nur en la sekvantaj du okazoj:

1. se la suplementita substantivo estas anoncvorto, kiu signas la specon, kategorion, kadron de la infinitiva ago; tiaokaze ĝi eĉ ne devas esti ad-substantivo: *a r t i f i k o, d a n ĝ e r o², i n t r i g o, k u t i m o, m a n i e r o, p o l i t i k o*. Ekz-e: *sperta pri artifiko elturniĝi el la devoj; bopatrino intrigo semi malpacon inter la geedzoj; abomena kutimo kraĉi sur la plankon; mirinda maniero esprimi dankon; malnova politiko inciti unu genton kontraŭ la alia; lia ideo enmiksiĝi estas senpripensa; enfali en danĝeron perdi sian posedafon²; ho malbenita rapideco flugi en kriman liton!²*

2. se la suplementita substantivo esprimas akcelon aŭ malakcelon de la infinitiva ago; tiaokaze validiĝas la cela signifo de la infinitivo (ni vidos

en § 186, ke la rekta infinitiva adjekto funkcias kiel celadjekto). Tiaj substantivoj estas:

a) la substantivaj formoj de la tri modaj helpverboj (vd. §§ 96, 116) kaj substantivoj pli-malpli parenc-signifaj: *volo*, *avido*, *decido*, *deziro*, *emo*, *intenco*, *inklino*, *klopodo*, *peno*, *pret(e)cio*, *promeso*^Z; *povo*^Z, *eblo*^Z, *espero*, *forto*^Z, *kompetento*, *libereco*^Z, *laco*, *nepovado*^Z, *okazo*^Z, *oportuno*, *rajto*^Z, *ŝanco*; *devo*, *bezono*^Z, *ĵuro*, *neceso*, *tasko*^Z ktp. Ekz-e: *min doloras la nepovado helpi vin*^Z; *sen forto moviĝi*; *oportuno solvi la problemon*; *laco paroli*; *libereco eliri*; *ĉu la preĝo ne posedas forton averti krimon?*^Z *jen rimedo por relevi la ŝtaton* (Kabe); *sen bezono serĉadi*^Z; *tasko lerni tri paĝojn parkere*; *min ligas promeso ne kaŝi veron*^Z;

b) la vortoj, kiuj esprimas manieron de instigo aŭ malinstigo: *admonono*, *konsilo*, *ordono*, (*mal*)*permeso*^Z, *propono*^Z ktp. Ekz-e: *venis la ordono ataki*; *la permeso havi kun si nepinon*^Z; *li ne tenis sin al mia konsilo vesti sin varme*; *lia propono elekti novan prezidanton ne estis akceptita*.

Plivastiga tamen la uzeblo de la infinitiva suplemento, kiam la infinitivo dependas de substantivo, kiu mem estas objekto de verbo. Tiam la verbo plus ĝia objekto fariĝas kvazaŭ verbaĵo, egalvalora al simpla verbo, almenaŭ laŭ gramatika valoro; ekz-e: *senti la bezonon* = *bezoni*; *havi la kuraĝon* = *kuraĝi*; *havi la honoron* = *esti honorata* ktp. Plejparte, tiuj verbaĵoj estas faritaj per la verbo *havi*, kiu iom perdas sian propran signifon, kaj ludas kvazaŭ rolon de gramatika ilo. Oni komprenos, ke post tiuj verbaĵoj, oni trovas regule infinitivon. Jen tabelo de la pli oftaj:

havi la ambicion, la avidon, bedaŭron, bezonon^Z, la bonecon^Z, la devon^Z, la deziron^Z, la eblon^Z, esperon^Z, la fieron, la forton^Z, la guston, la ĝojon, la honoron^Z, honton, la ideon^Z, la inklinton^Z, la intencon^Z, intereson^Z, la kapablon, kaŭzon^Z, la komision, la kruelecon, la kuraĝon, la kutimon, la liberecon^Z, motivon, la oficon, la paciencon, la permeson^Z, la plezuron^Z, la potencon, la povon^Z, la projekton^Z, la rajton^Z, rapidecon, soifon, la tempon^Z, la timon, la utilecon, la volon -i.

Kelkaj verbaĵoj estas farataj per aliaj verboj, kaj same konstruataj; tiuj verboj estas sinonimoj de *havi* aŭ *havigi*:

aa) verboj kun signifo *havi*:

ricevi la ordonon ion ludi^Z, *la permeson montri la birdon*^Z; *senti la bedaŭron*, *la danĝeron*^Z, *la devon*^Z, *la ĝojon*, *la neceson*, *la plezuron*, *skrupulon*, *sopiron*, *timon* -i; *posedi la forton*^Z, *la povon*^Z, *la rajton*^Z -i; *preni sur sin la taskon aranĝi*^Z; *enfali en la danĝeron perdi*^Z;

bb) verboj kun signifo *havigi*:

doni la esperon^Z, *la eblon*^Z, *averton*, *la guston*, *la ideon*^Z, *la konsilon*^Z, *la kuraĝon*^Z, *la malpermeson*, *la okazon*^Z, *la permeson*^Z, *la povon*, *la rajton*^Z, *la rimedon* -i; *lasi al iu eblon*, *liberecon*^Z, *povon*, *la rajton* -i;

meti sur iun la oficon subtenadi^z.

Fine kelkaj verbaĵoj estas konstruataj kun la verbo **esti**, kiu en tiaj turnoj proksimiĝas al la signifo **havi** (*estas al mi kaŭzo = mi havas la kaŭzon*): *ne estas kaŭzo timi^z; jam estas la tempo iri hejmen^z; estas la momento, la okazo, mia vico -i.*

V. Propozicia suplemento.

Ĝi estas enkondukita per **ke**: *la decido, ke oni ne akceptu virinojn, estis tre atakata.*

Tiajn propoziciojn oni povas rigardi ankaŭ epitetaj, kaj, kiel tiaj, ili estas studataj en la fraz-sintakso (§ 240).

142

B. ADJEKTIVA KERNO-VORTO

La suplementoj de la adjektivoj povas esti kvarspecaj: 1. adverbiaj; 2. substantivaj; 3. infinitivaj; 4. propoziciaj.

143

I. Adverba suplemento.

La sola okazo, kiam adjektivo povas havi adverban suplementon, estas, kiam ĝi estas determinita per adverbo veninta el substantiva radiko kvalit-esprima: vera suplemento tio estas, ĉar ĝi tiam prezentas specon de sinteza komparo: *horloĝe akurata* (= kiel horloĝo); *abisme stulta*.

Rim. I. Kontraŭe, oni devas rigardi kaj nomi "e p i t e t o" (kvankam tio ne estas konforma al la naciaj terminologioj) tiun adverbon, kiu estas nur la responda formo alprenita de adjektiva radiko, kiam ĝi determinas alian adjektivon: *ekstreme bela pentraĵo* efektive respondas al *ekstrema beleco de pentraĵo*; same en: *brila verdo* kaj: *brile verda*, la adverbo kaj la adjektivo havas signifon kaj funkcion tute analogan.

Rim. II. La adjektivo povas esti epitete determinata ankaŭ per adverbiaj radikoj: *tro riĉa*; *preskaŭ sama*. En tiaj okazoj, la adjektivoj apud la responda substantivo devenas el la adverba radiko: *troa riĉeco*, *preskaŭa sameco*. Sed, en kelkaj okazoj, la adverba epiteto estas esprimita per alia radiko ol la adjektiva: al *granda forto* respondas *tre* (ne: *grande!*) *forta*; al *malgranda malagrablaĵo* respondas *iom* (ne: *malgrande!*) *malagrabla*.

144

II. Substantiva suplemento.

Ĝi povas stari sub formoj: akuzativa aŭ prepozitiva.

a) *Akuzativa suplemento*. Oni trovas ĝin post adjektivoj esprimantaj spacan, tempan aŭ metaforan dimension, por precizigi tiun dimension: *homo, tri paŝojn distanca de mi*; *parolado du horojn longa*; *milionon valora artaĵo*; *ili elfosis reton de kanaloj, kelkmilojn da mejloj longan* (B); *la stacio estas nur unu mejlon malproksima de la ponto* (K); *pakaĵo tri kilogramojn peza*; *tridek jarojn aĝa*; *Esperanto estas multajn fojojn pli facila, ol ĉiu natura lingvo*.

Oni rimarku, ke tiu akuzativa suplemento staras preskaŭ ĉiam antaŭ la adjektivo; cetere, oni atentu, ke per ĝi oni esprimas nur mezuron, ne lokan situon: oni diras ja: *la domo estas tricent metrojn malproksima*, sed: *la domo estas malproksima de la preĝejo* (kaj ne: *la preĝejon*).

b) *Prepozitiva suplemento*. Same kiel la baza ligilo inter du substantivoj estas *de*, la baza ligilo inter adjektivo kaj substantivo estas *je*. Sed, ĉar tiu prepozicio estas pure abstrakta ilo, sen io senta aŭ logika koloro, baldaŭ oni emis uzi aliajn pli konkretajn kaj signifoplenajn; tiun ten-

dencon iniciatis Z. mem ("la pli kompetentaj esperantistoj en la lasta tempo ne senprave evitadis tiun ĉi vorton" – 1894) kaj, se ĝi estas bedaŭrinda laŭ la vidpunkto de la simpleco, ĝi estas aprobinda el arta vidpunkto.

Nun, oni uzas je preskaŭ nur en la sekvantaj okazoj:

1. por anstataŭigi la mezuran akuzativon, kiam la mezursuplemento estas plurvorta: *ili estis malproksimaj unu de la alia je vojaĝo de tri tagoj* (*malproksimaj tritagan vojaĝon* estus ebla, sed malpli klara); aŭ kiam la adjektivo estas modifita de komparacia adverbo: *tiu knabo estas pli malpeza ol lia frato je du kilogramoj; la "longulo" estis je tuta kapo pli alta, ol ĉiuj aliaj².*

2. post adjektivoj signifantaj abundon aŭ senigon: *abunda, graveda (graveda je astroj), plena, riĉa (je brutoj²). sata, inkluziva, ekskluziva, kripla (je la dekstra kruro), dezerta, libera (je tiuj mankoj²), nuda, sena, senigita* ktp.

3. post kelkaj adjektivoj, kies rilato al la suplementa substantivo estas malfacile difinebla: *inda (je honoro²), kapabla (je ĉio²), kontenta (je sia sorto²), malsana (je la stomako), malseka (je sango); feliĉa je monludo, malfeliĉa je amo; lama (je ambaŭ piedoj²).*

En ĉiuj aliaj okazoj oni uzas aliajn prepoziciojn, kiuj estas ofte (ne ĉiam!) pli precizaj:

Al estas uzata post adjektivoj montrantaj:

1. estmanieron de la koncernataĵo rilatan al iu aŭ io: *afabla, amika, aspira, avida, bona, danĝera², danka², ema, envia, favora, fidela, indulga, inklina², minaca, sopira, surda (al ia peto²).*

2. bonan aŭ malbonan econ de iu aŭ io rilatan al la koncernataĵo: *abomena, agrabla, antipatia, fremda, kara², perfida, plaĉa, simpatia², utila.*

3. konkretan aŭ metaforan proksimecon: *analoga, apuda, egala, konforma, kutima, laŭa, najbara, parenca², proksima², responda, rilata, simila².*

De estas uzata:

1. post adjektivoj montrantaj konkretan aŭ metaforan malproksimecon: *aparta, diferenca, distanca, distinga, ekskluziva, inversa, libera², malproksima.*

2. por montri tre ĝenerale la kaŭzon: *ebria², laca, plena², rabia, malsana², pala², varma²* ktp. (oni trovas ankaŭ **pro** en tia okazo).

Kontraŭ estas uzata por montri la personon trafitan de la eco montrata de la adjektivo: *afabla, antipatia, bona², brava², galanta, singardema, humila, malhumila, imuna, indifera², ĵaluza, koketa* (oni trovas ankaŭ **antaŭ** en tiu okazo).

Kun estas uzata post adjektivoj de simileco, rilateco: *akorda, analoga, familiara, identa², kontrasta², korelativa, proporcia, responda* ktp. (Z. uzas ĝin post *singarda, avara* kun la signifo de **pri**: tio estas evitinda).

Por estas uzata kiam enestas ideo pri celo, post: *agrabla^Z, bezona, danĝera, indiferenta^Z, indulga, inklina, kapabla^Z, kara^Z, konvena^Z, modela, modesta, necesa, oportuna, preta^Z, sufiĉa, taŭga, utila* ktp.

Pri estas uzata por montri la aferon, okaze de kiu oni atribuas ian kvaliton al iu: *avara^Z, avida, blinda, certa, diligenta, diskreta, fier^Z, forta* (sed ankaŭ: *forta en ĉio^Z*), *indiferenta^Z, singarda^Z, ĵaluza, kompetenta^Z, kontenta^Z, kulpa, modesta^Z, sperta* ktp.

Rim. I. Post *responda* oni trovas, laŭ ties diversaj sencoj: **por:** *aĝo responda* (taŭga) *por edziniĝo^Z*; **al^Z:** *tiuj informoj ne estas respondaj al* (kongruaj kun) *la miaj*; (oni trovas ankaŭ *interrespondaj kun* aŭ *respondaj kun*), **antaŭ^Z kaj pri^Z:** *pri tio vi estas responda antaŭ Dio.*

Oni vidas el la supra listo, ke oni povas, post la sama adjektivo, uzi, laŭ la signifnuanco, diversajn prepoziciojn; ekz-e, kiam adjektivo povas havi samtempe personan kaj aferan suplementojn, oni uzas **kontraŭ** aŭ **al** por montri la personon, kaj **pri** aŭ **per** por montri la aferon.

Rim. II. Ni vidis, ke la suplemento de adjektivo en formo de relativa superlativo estas enkondukita per *el* aŭ *inter* (§ 73.).

145

III. Infinitiva suplemento.

Ĝi estas tre malofta. Oni trovas ĝin preskaŭ nur post: *ema, inklina, kapabla, libera* kaj *preta*, kiuj havas ĉiuj analogan signifon: *mi estas inklina akcepti vian proponon^Z*; *laboron, kiun ŝi ne estis kapabla plenumi^Z*; *vi estas tute libera fari al vi justecon^Z*; *ŝi estis preta sveni^Z*. Oni povas ankaŭ renkonti ĝin post adjektivoj sent-esprimaj, kvankam tia uzo ne estas *Z*-a: *feliĉa fine revidi siajn infanojn*; *kontenta ricevi kelkajn panpecojn*; *ŝi estis laca esti diino de la balo (K)*.

146

IV. Propozicia suplemento.

La propozicia suplemento havas du formojn:

1. komparan, plejofte elipsan propozicion, enkondukitan per **ol**, oni trovas post la adjektivoj: *alia, malsama* kaj post ĉiuj neegalecaj komparativoj: *kun la tempo la formo de la lingvo eble estos alia, ol tiu, pri kiu ni nun laboras^Z*; *tiu propono estas tute malsama ol la mia*; *li estas pli granda, sed malpli inteligenta, ol mi*. Saman, sed enkondukitan per **kiel**, oni trovas post la adjektivo *sama* kaj post ĉiuj egalecaj komparativoj: *la uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj^Z*; *via opinio estas la sama, kiel la mia*.

2. eksplikitan propozicion oni povas trovi post kelkaj adjektivoj: *certa jam, ke oni ne malhelpos lin, li trankvile batis la knabon*; *ĵaluza, ke lia edziĝo koketis kun mi, li forsendis min*; *ĝoja, ke li nun povas iom perlabori, la junulo prenis la varojn kaj eliris*.

C. ADVERBA KERNO -VORTO

La suplementoj de la adverbo estas trispecaj: 1. adverbaj; 2. substantivaj; 3. propoziciaj. 147

I. Adverba suplemento.

Kiel apud la adjektivo, la adverba suplemento devenas el substantivaj radikoj kvalitesprimaj: *infane naive* (= kiel infano); *horloĝe akurate*.

Rim. Kontraŭe, oni devas rigardi *epiteto* la adverban determinilon de adverbo, se ĝi estas primitiva aŭ adjektivradika adverbo: *ŝi tute naive respondis; tre bele kanti; tro laŭte paroli*. Kp. § 143. Rim. I.

II. Substantiva suplemento. 148

La substantiva suplemento povas ricevi du formojn: akuzativan aŭ prepozitivan.

Akuzativan suplementon oni povas uzi post adverboj devenantaj de verba radiko: *responde vian leteron; danke vian oferon*. Tamen ĝi estas ofta nur post *inkluzive, koncerne, rilate kaj spite*. Ekz-e: *li donis... siajn vestojn, inkluzive sian glavon^Z; kion mi faru koncerne mian filon?^Z ili sidis, plenkreskuloj kaj tamen infanoj koncerne sian koron^Z; kiel li povas esti tiel blinda rilate sin mem?^Z; spite miajn malamikojn, liberigu min!^Z* (vd. § 122. Rim.).

Prepozitiva suplemento troviĝas post multaj adverboj, ekz-e: *mi aŭdis ĝian kriadon kaŭze de ĝiaj premantoj^Z*. Sed pli ĝusta analizo rigardas en tiaj okazoj la adverbon kun la prepozicio kiel prepoziciaĵon (*kaŭze de = pro*); ni jam studis tiun esprim-manieron sub § 122.

III. Propozicia suplemento. 149

Oni trovas post la komparaciaj adverboj la samajn komparajn prepoziciojn, kiel post la adjektivoj: *ŝi kantas pli pure ol ŝia fratino; la fino estas tiel malbone skribita, kiel la komenco*. Oni trovas ilin ankaŭ post la adverboj *same, malsame, egale, alie*: *mi opinias tute same kiel vi; tute malsame, ol vi*.

D. VERBA KERNO-VORTO

150

La komplementojn de la predikata verbo oni ne nomas suplementoj, sed objektoj aŭ adjektoj. Ili estas strikte ligitaj kun la strukturo de la propozicio; tial ni okupiĝas pri ili en la propozicio-sintakso (§§ 176–213).

Sed la verbo povas esti uzata ankaŭ alie ol predikate, ekz-e en infinitiva formo kun valoro de subjekto, objekto, predikativo, suplemento, adjekto (vd. § 117), aŭ en participa formo kun valoro de predikativo, adjekto, epiteto (vd. § 117). La komplementojn de tiaj nepredikataj verboj oni povas nomi *suplementoj*.

1. *Suplementoj de infinitivo.*

Ili kondukas tute same, kiel la predikataj komplementoj (objekto, adjekto).

a) objekto: *mi volas viziti mian amikon*; vd. § 176.

b) adverba adjekto: *mi bezonas tage-nokte klopodi*; vd. § 183.

c) prepozitiva adjekto: *mi devas iri en la lernejon*; vd. § 185.

d) propozicia suplemento: *anonci, ke oni venos kaj ne veni, estas malĝentilaĵo*; vd. en la fraz-sintakso ĉe la objekta kompletivo (§ 233).

Rim. I. Infinitivo povas havi ankaŭ infinitivan suplementon: *vi ne povas min devigi iri tien*.

2. *Suplementoj de participo.*

En adjektiva kaj adverba formo ili povas havi la samajn komplementojn kun la sama valoro kiel la predikata verbo:

a) objekton: *domo havanta tri fenestrojn; donacinte libron al la infanoj...*

b) adverb-adjekton: *homo fervore laboranta*;

c) prepozitivan adjekton: *infano kuranta sur la kampo*;

d) propozician suplementon: *ne sciante, kio okazos...*

Rim. II. Substantiva participo ne povas havi komplementojn predikatajn (adverb-adjekton, rektan objekton). Ĝiaj suplementoj kondukas same kiel la suplementoj de la ad-substantivoj (vd. §§ 135–139). Kp. § 128. Rim. II.

II. PROPOZICIO-SINTAKSO

- 151** Propozicio estas esence la lingva formo por esprimi la plej simplan agon de la spirito: la juĝon. La vortojn, el kiuj konsistas ties esenca parto, grupiĝinta ĉirkaŭ la predikato, oni povas nomi, laŭ ilia funkcio, *strukturaj frazelementoj*. La unua parto de la propozicio-sintakso okupiĝas pri tiuj strukturaj frazelementoj (subjekto, predikato, objekto, adjekto), sub la titolo: **strukturo de la propozicio**.
En la dua parto de la propozicio-sintakso ni pritraktos la diversajn **specojn de la propozicioj**.

A. STRUKTURO DE LA PROPOZICIO

152

El la vidpunkto de la logiko, la propozicio konsistas nepre el du elementoj: el la io, pri kiu oni asertas ion, kaj el tio, kion oni asertas pri ĝi. La unuan oni nomas *subjekto*, la duan *predikato*. El la vidpunkto de la gramatiko tiu distingo estas ja valora, sed ne universala. Ne mankas okazoj, en kiuj forestas ĉia subjekto: oni kutimas diri, ke tiam ĝi estas subkomprenata. Tamen, kelkfoje la penso estas tiel elementa, tiel sinteza, ke ĉia analizo estus erara: kiam kolera mastro krias al servisto: *for!* li esprimas tre klaran penson, sed en tiu li mem konscias nenian distingon inter subjekto kaj predikato: tio estas penso tute simila, en sia nedividebleco, al ago, forpuŝo aŭ pugnobato. Trudi perforte en tiaj okazoj la metodon de subkomprenado estas simpla harfendado.

Se oni analizas frazojn, oni facile konstatas, ke ĉiuj propozicioj povas reduktiĝi al du tipoj: per la unua oni esence volas esprimi ian agon, kiun oni eventuale precizigas per la mencio de ties tempopunkto, daŭro, subjekto aŭ objekto: *mi diras la veron... rigardu vin mem... mi vendis la braceleton... postmorgaŭ vi formetos ĉi tiun funebran veston²...* Per la alia oni volas esprimi, ke ia aĵo (persono aŭ afero) posedas ian kvaliton: *vi estas ankoraŭ granda infano²; kolombo estas birdo²; la patro estas sana*. La unuan tipon ni nomas *ag-propozicio*, la duan *ec-propozicio*. Tiuj du tipoj estas en Esperanto pli diferencaj ol ĉe senkazaj lingvoj, kiel la franca aŭ angla. Tamen tiu distingo utilas precipe pri la studo de la predikato, kaj ni povas preskaŭ ne uzi ĝin ĉe la studo de la subjekto aŭ de la adjektoj.

LA SUBJEKTO

153

La ulo aŭ aĵo, kies agon, staton, ekziston aŭ econ oni esprimas, estas nomata la subjekto. En la ag-propozicioj, la subjekto ne ĉiam estas la aganto; ĉe la pasivo ĝi estas male la agato: *la tapiŝo estas batita*. Oni ne devas do konfuzi tiujn du nociojn de subjekto kaj aganto. Cetere, ni jam vidis, ke ago povas esti esprimita ankaŭ per aliaj rimedoj ol per predikata verbo: ĉar ĉiuj agoj havas (esprimitan aŭ ne) subjekton, oni devas do distingi la propozician subjekton disde la ceteraj: ili esprimiĝas diverse, laŭ la diversaj manieroj, kiel esprimiĝas la ago. Ni studos do ĉiun aparte.

LA SUBJEKTO DE LA AGO

Ago en predikata verbo

154

1. *La verbo staras en finitivo (indikativo, kondicionalo aŭ volitivo).* Tiam la subjekto estas tiu de la tuta propozico. Por trovi ĝin, oni metas unu el la pronomoj *kiu, kiuj* aŭ *kio* antaŭ la verbo: *ne eterne daŭras malgajeco^Z* (kio ne daŭras? – *malgajeco*); *viajn zorgojn kreis pasio^Z* (kio kreis? – *pasio*). Oni tiel konstatas, ke la propozicia subjekto staras en nominativo, almenaŭ se ĝi estas variiva vorto. Ĉar, je la tria persono de la verbo, oni povas uzi kiel subjekton plej diversajn vortojn:

a) substantivon: *ŝtelisto ŝteliston evitas^Z*;

b) (pronomon) kvazaŭnomon: *ĉiu havas sian guston^Z*;

c) (pronomon) reprezentanton: *se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas^Z*.

d) substantivigitan parolelementon: *sia estas kara pli ol najbara^Z*; *sur la arbo sin trovis multe da birdoj^Z*; *la por kaj la kontraŭ estas ambaŭ defendeblaj*; *ĉiu "li" havas sian "ŝi"^Z*; *la "tuj" de sinjoroj estas multe da horoj^Z*; *pli bona estas malgranda "jen prenu", ol granda "morgaŭ venu"^Z*.

e) infinitivon: *kritiki estas facile, fari malfacile^Z*; *tedis vin esti mastro en via domo^Z*.

Rim. I. Ĉe kelkaj ne-transitivaj verboj, tio estas eĉ la plej ofta okazo: *prosperis al mi vidi...^Z*; *restas nur al mi morti^Z*; *sufiĉas nur atendi, kaj ni venkos*.

f) tutan propozicion: *ĉu estas eble, ke vi tiel malmulte konas la mondajn postulojn?^Z kio pasis, ne revenos^Z*.

Je la unua kaj dua personoj, subjekto povas esti nur la personaloj: *mi, ni, vi*.

Rim. II. Kiam unu sama vorto estas la subjekto de pluraj verboj, oni povas ne ripeti ĝin, se oni volas fari impreson de rapideco: *li celis, pafis, trafis* – aŭ de unu sola kompleksa ago: *mi miras, timas, tremas^Z*. Oni povas elipsi la subjekton ankaŭ el postaj kunorditaj prop-oj: *mi serĉis, sed ne trovis*; tio estas eĉ preferinda al la ripeto. Sed oni ne konduku tiun elipsadon trans la finon de la frazo: post punkto necesas nova esprimo de subjekto, aŭ per ripeto aŭ per person-pronomo, ĉar en Esp-o la verbo sola ne estas personmontra kiel en multaj naciaj lingvoj. Kp. § 164 kaj 167.

2. *La verbo staras en infinitivo.* Tiam la subjekto neniam estas esprimata; ĝin montras la ĉirkaŭteksto: *ĉu esti aŭ ne esti?* (= *ĉu mi ekzistu aŭ mortu?*); *kion fari?* *Vi ne havas talenton^Z* (= *kion vi povas fari?*); *por kio paroli pri amo al proksimulo?^Z* (= *por kio vi parolas...?*); *mi de teruro ne sciis, kion fari^Z* (= *kion mi faru*).

Ago en nepredikata verbo

155

1. *La verbo staras en infinitivo.*

a) La subjekto estas la sama, kiel tiu de la predikata verbo: *mi mem intencas tion fari^Z*; *kion vi havis por diri al mi? anstataŭ babiladi, ri-*

*gardu la faktojn*².

b) La subjekto estas samtempe la objekto de la predikata verbo: *mi petas vin kredi*²; *lasu min reakiri mian spiron*²; *permesu al mi kisi vian manon*² (= ke mi kredu, reakiru, kisu).

Rim. I. Tiu objekto estas ĝenerale neesprimita, kiam la infinitivo dependas de la verboj *ordoni* kaj *sendi*: *Faraono sendis alvoki Jozefon*² (= *sendis iun alvoki Jozefon*); *mi sendos venigi kuracistojn*²; *Aĥaŝveroŝ ordonis venigi al li la reĝinon Vaŝti*²; *la ordonojn, kiujn la Eternulo ordonis fari*². Estus eraro en tiaj okazoj, rigardi la infinitivon pasivsignifa: ĉar ties subjekton ne povas esprimi pasiva agant-adjekto, sed nur la objekto de l' predikata ĉefverbo: *la superpolicanon mi sendis purigi la trotuaron*²; *la ordonojn, kiujn li ordonis al ni fari*.

Rim. II. Male, kiam la infinitivo dependas de la verbo *lasi*, oni povas rigardi la infinitivon pasivsignifa, sed nur, kiam la subjekto de la infinitivo estas la sama, kiel tiu de la predikata verbo: *vi lasos forlogi vin*². Ĉar tiam, oni povas esprimi ties subjekton sub formo de pasiva agant-adjekto: *ŝi lasis sin peli de la ondoj*². En la aliaj okazoj, la infinitivo estas aktiva: *Paŭlo lasis bati sian fratinnon* (ke ŝi batu). Por esprimi la malan ideon, aŭ oni klare montru la pasivecon: *li lasis sian fratinnon esti batata*, aŭ oni uzu alian dirmanieron: *li lasis iun bati lian fratinnon*.

c) Kiam la infinitivo dependas de substantivo aŭ adjektivo, ĝia subjekto estas la sama, kiel tiu de la substantivo aŭ adjektivo: *mia deziro gloriĝi* (= *la deziro, ke mi gloriĝu*); *ŝi estas preta fari tion*; krom ĉe la verbaĵoj montritaj en § 141: *li donis al mi la permeson fumi*.

d) La subjekto estas tute nedifinita, kaj sekve ne estas esprimata: *esti honesta en tiu ĉi mondo signifas esti elektita inter dek mil*²; *ĝi estas io terura, esti akuzata de edzo, kiam...*²

2. La verbo *staras en participo*.

a) Kiam la participo havas la adverban formon, ĝia subjekto estas devige tiu de la predikata ĉefverbo; *selante ĉevalon, oni ĝin karesas*² (= la selanto estas la karesanto). Vd. §§ 158, 183.

b) Kiam la participo havas la adjektivan formon, ĝia subjekto estas la determinita de ĝi substantivo: *ne ĉio brilanta estas diamanto*² (= ĉio, kio brilas); *ne timu hundon bojantan*² (= kiam hundo bojas); *ne aŭdu vian sklavon malbenanta vin*² (= ke via sklavo malbenas vin).

c) En la sama okazo la subjekto povas esti tiel nedifinita, ke ĝi ne bezonas esprimiĝon: *batita komprenas aludon*²; *brogita eĉ sur akvon blovas*² (= oni batis; oni brogis).

Ago en substantivo

a) Ni vidis (§ 135–138), ke tiam la subjekto estas esprimita sub formo de suplemento aŭ de apudmetita posesivo aŭ personalo: *putrado de fiŝo komenciĝas de la kapo*² (kiam ekputras fiŝo...); *mia alestado plu ne venenos al vi la ĝuadon*² (= mi alestas; vi ĝuas...).

b) Ofte la subjekto estas tiel nedifinita, ke ĝi ne bezonas esprimiĝon: *oni aŭdis muzikon kaj kantadon*²; *ripetado estas plej bona lernado*² (= onia kantado, lernado).

Ago en adjektivo

La subjekto estas la de ĝi determinita substantivo: *la gazetisto, favora al Esperanto, konsentis nian peton (= gazetisto favoras...); timu hundon silentan^z (= se hundo silentas).*

Ago en adverbo

La subjekto estas esprimata vokative: *for en la polvon, vi brilanta ornamo^z* aŭ tute ne esprimata: *for de tie ĉi!*

AKORDO AL LA SUBJEKTO

Akordo de verbo

- 157** Ĉar en Esperanto la verbo varias nek laŭ genro nek laŭ nombro, oni ne povas paroli pri akordo inter verbo kaj subjekto; la demando povus elmetiĝi nur ĉe la malsimplaj tempoj, sed tiam, laŭ la vidpunkto de la akordo, la okazo ne distingiĝas de tiu de la predikativo rilate al la subjekto: *ili estas amataj* akordiĝas kiel *ili estas ĉarmaj* (vd. § 169, 1.).

Akordo de epiteto

- 158** Laŭ la ĝenerala regulo, kiun ni vidis en § 128, la epitetoj akordiĝas kaze kaj nombre kun la subjekto: *blanka domo staras antaŭ ni – blankaj domoj staras antaŭ ni; mi, esperantisto – ni, esperantistoj, ne povas aprobi tion.*

Pri la participa epiteto de la subjekto validas tio sama, kio pri la particip-epitetoj ĝenerale (vd. § 128).

Sed kiam la participa ago rilatas malpli strikte al la subjekto mem, ol al la predikato, karakterizante la predikatan agon kaj esprimante ties tempon aŭ ian cirkonstancon, la participo alprenas la e-finaĵon kaj fariĝas adjekto, anstataŭigebla per adjekta subpropozicio: *li venis al mi tute neatendite^z* (= dum lin oni ne atendis). Tiu particip-adverbo povas rilati nur al la subjekto, t.e. povas esprimi nur ties staton aŭ agon, aktivan aŭ pasivan (vd. § 183.II).

Ekzistas okazoj, kiam la participo kvazaŭ unuigas en si la signifon de la epiteto kaj adjekto, t.e. ĝi karakterizas samemfaze la subjekton kaj la agon: *kuŝantaj, sidantaj, sencele paŝantaj, la soldatoj atendis la horon de la parado.* Kiel oni vidas, en tiaj a d j e k t - e p i t e t o j la participo havas finaĵon adjektivan, sed estas apartigita disde la subjekto, al kiu ĝi rilatas kaj kun kiu ĝi nombre akordiĝas.

Reprezentantoj de la subjekto

- 159** Ĉar estas ĉiam bezone klare scii, pri kio aŭ kiu oni parolas, la lingvo disponas apartajn rimedojn por reprezenti la subjekton aŭ signi ĝian posedantecon. Temas cetere nur pri la 3.a persono, ĉar ĉe la du unuaj ne povas okazi konfuzo, dank' al la unikeco de ilia signifo: ne povas esti

pluraj *mi* aŭ pluraj *ni*, nek pluraj *vi* en konversacio; male ofte estas pluraj *li*, *ŝi*, *ĝi*, aŭ *ili*.

Ni jam vidis (§§ 47 kaj 53), ke en sinsekvaj propozicioj oni uzas person-pronomon (*li*, *ŝi*, *ĝi*, *ili*) por reprezenti la subjekton de la antaŭa propozicio, kaj demonstrativon (*tiu*, *tiu ĉi*) por reprezenti personon alian ol tiu subjekto.

En la interno de propozicio, la subjekto ne estas reprezentata per la ordinaraj personaloj, sed per aparta formo, la refleksivo *si*.

Same, la posedanteco, en sinsekvaj propozicioj, estas montrata per *lia*, *sia*, *ĝia*, *ilia*, se la posedanto estas la subjekto de la antaŭa propozicio, kaj per *ties*, se la posedanto estas alia persono, ol tiu subjekto (§ 79).

En la interno de propozicio la posedanteco de la subjekto ne estas montrata per la ordinaraj posedadjektivoj, sed per aparta formo, la refleksiva posesivo *sia*.

Ni nun klarigos la uzadon de tiuj refleksivoj *si* kaj *sia*.

LA REFLEKSIVO

Ĝenerala uzo

I. *La refleksivo estas uzata nur rilate kun 3.a persono.*

La kelkaj ekzemploj, en kiuj *Z.* uzas *si* por reprezenti unuan aŭ duan personon, estas plumeraroj kaŭzigitaj de la influo de slavaj lingvoj.

Triapersonaj oni rigardas la u-finajn pronomojn, kiam ili reprezentas unu personon el inter pluraj individuoj signitaj per *ni* aŭ *vi*; oni do uzas *sia* kun ili: *tiu aŭ tiu inter vi perfidos sian majstron; iuj el ni ne ricevis sian porcion; vi reiros ĉiu al sia posedaĵo²; neniu el vi evitos sian sorton; kiu el ni perdis sian monujon?* *Sia* tiam rilatas al la persono(j) reprezentita(j) per la u-pronomo, dum *nia* aŭ *via* rilatus al la tuta grupo reprezentita per *vi* aŭ *ni*: *iu el ni alportos nian panon* (panon komunan al *ni* ĉiuj); sed: *ĉiu el ni faros sian devon* (ĉiu sian apartan). Kiam *ĉiuj* estas epiteto de *ni* aŭ *vi*, oni povas uzi nur *nia* aŭ *via*, ĉar *ĉiuj* signas la tutan kolektivon sen distingo de apartuloj: *ni ĉiuj faros nian devon*. La uzado estas la sama post "multe el" aŭ "multaj el": *multe el vi portas en sia koro la samajn idealojn²; multaj el ni aŭdis tiun fabelon en sia infaneco².*

Se *kiu* reprezentas la pronomojn *ni* aŭ *vi*, Zamenhof ĝin rigardas:

jen triapersona: *Vi, kiu fortigas montojn per s i a forto!^{1,2}; regno de homoj, kiu apartenas al ĉiuj s i a j honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi!²*

jen sampersona kiel la reprezentato: *ho vi, Diano, kiu v i a n fraton amegas pli ol ĉion en la mondo²; Vi, kiu per Via dekstra mano helpas la fidantojn²* (korektita en la Londona eldono de la Biblio: *Vi, kiu per s i a mano*).

Se oni konsideras, ke en tiaj okazoj *Z.* uzis la *sia*-formon supozeble sub la influo de la slavaj lingvoj, dum la *via*-formon certe li uzis *malgraŭ*

tiu influo, oni devas rigardi la *lastan* formon kiel la intencon de Z. Ni do insiste konsilas uzi tiun ĉi formon, des pli ke ĝi estas ankaŭ pli internacia.

Rim. I. La regulo I. ne aplikigas al la vortoj kunmetitaj kun *sin-*: *mi estas singardema; via sindonemo estis senfina*. Tamen, anstataŭ *sinfido, sinofero, sinamo, sinregema* estas konsilinde uzi *memfido, memofero, memamo, memregema*, kaj anstataŭ *sindetenido* oni povas uzi *detenigemo*.

La regulo, male, aplikigas al la vortoj kunmetitaj kun *sia-*: *ĉiu forvadis siaflanken^Z; sed: atendu, ĝis mi miaparte decidos; ĉu vi konsentas viaflanke? ni ne vidis tie niaspecajn homojn*; kp. § 38. 1. (Pri *s i a t e m p e* vd. ĉi-sube sub II. b. 2.).

II. La refleksivo resendas al la subjekto.

a) Ĝi ne povas do esti mem subjekto aŭ determini subjekton. La demando ne gravas pri si, kiun neniu iam emus uzi tiamaniere, sed pri *sia*, kiun oni povus esti inklina uzi antaŭ parto de kompleksa subjekto por resendi al la alia parto: oni tiam uzu la rektajn posedpronomojn: *Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn^Z; aŭ ŝi, aŭ ŝia servistino estas kulpa*. Sed oni diros: *la mastro kun sia amiko promenis en la parko* (ĉar *amiko* estas suplemento de la subjekto, kaj ne mem parta subjekto; kp.: *la mastro kaj lia amiko promenis...*); *lia amo al si difektas lian karakteron*.

Rim. II. Ne temas tie ĉi pri la substantiva uzado de si kaj *sia*, kiuj tiaokaze perdas siajn pronomajn proprecojn kaj povas roli kiel subjektoj: *si estas la ŝlosilo de la homa koro; sia estas kara pli ol najbara^Z*.

b) Ĝi devas do anstataŭi aŭ rilati nur subjekton. Tiu absoluta leĝo allasas tamen tri esceptojn:

1. si en la formuloj *en si, per si (mem)* kaj *inter si* perdas iel sian apartan signifon, kaj la tuta esprimo estas rigardata kaj uzata kiel unu sola adverbo, sen obeo al la refleksivecaj reguloj: *oni ne povas ekkoni la realon en si (= tia, kia ĝi estas); oni komprenis liajn gestojn per si mem (propraefike, sen fremda helpo); tiujn malsamajn objektojn miksi inter si oni neniel devas^Z (= miksi reciproke)*;

2. *sia* en la formulo *siatemp*e perdas iel sian apartan signifon, kaj tiu kunmetita adverbo estas uzata por rilati al alio ol al la subjekto, kun la du signifoj: "e n k o n v e n a t e m p o": *tiam mi donos al via lando pluvon siatemp*e^Z; kaj "e n l a p a s i n t a t e m p o": *ĉion li kreis bela siatemp*e^Z; *la granda miro, kun kiu mi rigardis siatemp*e tiujn heroojn^Z; *mi volis siatemp*e proponi komunan regulon^Z. Z. eĉ uzis foje en *sia tempo* laŭ la sama maniero: *faru ĝin en sia tempo*; sed tio estas evitinda, kaj la ĵusa ekzemplo estis korektita al "en ĝia tempo" en la Londona Biblio (Nombroj, IX, 3).

3. *sia* fine akiras en kelkaj esprimoj la signifon de "s i a p r o p r a", kaj tiam ne obeas la supre diritan regulon: tio okazas, kiam ĝi rilatas kun *ĉiu, ĉio*: *metu ĉion en sian lokon; por ĉiu afero estas sia tempo kaj maniero^Z; al ĉiu sia propra estas ĉarma kaj kara^Z; en ĉiu kranio estas sia opinio^Z; ĉiu sezono kun sia bono^Z*.

Rim. III. Zamenhof uzis plurfoje *sia* kun la valoro de "sia propra", kiam ĝi kvalifikas substantivon ligitan al alia per la prepozicioj *kun, ĉe, apud* kaj esprimantan ties kutiman, distingitan econ: *ŝi rimarkis la reĝon de la maro kun sia krono^z; ĉiuj dormis, krom la direktilisto apud sia direktilo^z*. Ĉar tia uzo povas ofte krei miskomprenojn aŭ strangaĵojn ("ĉu oni diru, skribis R. Schwartz: *mi vidis la reĝon kun sia krono kaj lia plumbrelo?*"), ĝi estas nekonsilinda.

III. La refleksivo anstataŭas aŭ rilatas la subjekton de la plej proksime esprimita ago.

Tio ĉi estas la plej distinga karaktero de la Esperanta refleksivo.. En la aliaj lingvoj, oni ĝenerale konsideras, kiel indikilon por la uzo aŭ neuzo de la refleksivo, la subjekton de la koncerna propozicio aŭ eĉ de la frazo. En Esperanto oni atentis nur la subjekton de tiu ago, kiun plej rekte koncernas la refleksivo. Nu, ni vidis (§ 153–155), ke la agon povas esprimi plej diversaj vortoj: ĉiu el tiaj vortoj fariĝas centro, ĉirkaŭ kiu stariĝas rilatoj postulantaj aŭ ne la refleksivon.

Komprenoble povas okazi, ke en propozicio estas nur unu vorto esprimanta agon (ĝi tiam estas devige la predikata verbo); en tiu okazo la refleksivo rilatas tre simple al la propozicia subjekto: *timulo timas eĉ sian propran ombron^z; ili sin jetis sur min^z*.

Sed tre ofte, en unu propozicio enestas, krom la predikata verbo, ankaŭ aliaj vortoj esprimantaj agon (participo, infinitivo, substantivo, adjektivo, adverbo). Tiam oni povas konsideri, laŭ la vidpunkto de la refleksivo, ke la propozicio dismembriga en tiom da *fakoj*, kiom estas da ag-vortoj; kaj nur interne de tiuj fakoj funkcias la regulo de la subjekta rilateco de la refleksivo. Ni konsideru ekz-e kelkajn frazojn, kaj apartigu tiujn fakojn per streketoj:

la mastro de Ezopo lin sendis al la kampoj / por forigi de si objekton tiel malĉarman (la subjekto de *forigi* estas la mastro; do: *for de si!*)

la mastro de Ezopo lin sendis al la kampoj / alporti al li la farmopagon (la subjekto de *alporti* estas Ezopo; do: *al li!*)

se al iu homo Dio donis riĉecon kaj donis al li la povon / ĝui plezuron de ĉiuj siaj laboroj...^z (laboroj *s i a j*, ĉar temas pri laboroj de *h o m o*, subjekto de *ĝ u i*)

ne ekzistas alia bono por la homo / krom manĝi / kaj trinki / kaj igi sian animon / ĝui plezuron de lia laborado (Biblio) (animon *s i a n*, ĉar temas pri la animo de *h o m o*, subjekto de *ig i*; sed laborado *l i a*, ĉar temas pri la laborado de *h o m o*, dum la subjekto de *ĝ u i* estas la *a n i m o*. Cetere la teksto de Z. donas, en la dua parto: *igi sian animon ĝui plezuron de sia laborado*; sed nur ŝajna estas la diferenco, ĉar "sian animon" estas hebreismo anstataŭ "sin mem", kaj Z. tradukis laŭ tiu efektiva senco).

Rim. IV. Povas okazi, ke la predikato estas subkomprenata, tamen, ĝi regulas la uzon de la refleksivo: *ĉiu angulo kun sia sanktulo^z* (subkomprene: *estu*); *al ĉiu frato lian parton^z* (subkomprene: *donu*).

IV. Por resume formuli la regulon de la refleksivo, oni do devas antaŭe

konsideri la sekvantajn tri punktojn:

1. En la propozicioj povas troviĝi, krom la predikata verbo, ankaŭ alia verbo (infinitivo) aŭ verbovalora vorto (participo, verbradika adjektivo aŭ substantivo).
2. Tiaj *kromaj ag-esprimoj* povas havi siajn apartajn komplementojn kaj ankaŭ sian *ekstran* (aktivan aŭ pasivan) *ag-subjekton*, ne identan kun la subjekto de la predikata verbo. Tiu ekstra subjekto ĝenerale estas neesprimita, sed facile konstatebla.
3. Se la kroma ag-esprimo havas ekstran ag-subjekton, ĝi formas ĉirkaŭ ĝi kvazaŭ sendependan teritorion, fermitan de ĉina muro, tra kiu ne povas penetri la efiko de la predikata verbo. Kaj tiam la ekstra ag-subjekto regas suverene pri la refleksivo "inter siaj muroj": tie la refleksivo reprezentas ne la predikatan, sed la kromverban ag-subjekton. Baze de ĉio ĉi, jen la **regulo de la refleksivo**, en konciza konkludo.

Si identiĝas }
 Sia signas apartenon } kun { tiu ag-subjekto
 } al { (predikata aŭ ekstra),
 } sur kies "teritorio" ĝi troviĝas.

Ekzemplojn pri tio ĉi ni jam donis en ĉi tiu paragrafo, sed por ĝin detale ilustrati, ni montros la aplikon de la regulo en diversaj

TIPOJ KAJ EKZEMPLOJ

161

Por klarigi do la uzon de la refleksivo, ni esploros la diversajn okazojn montritajn sub §§ 154-155. Sube ni citos por ĉiu okazo simplan imagitan tipon, kaj poste ekzemplojn laŭeble zamenhofajn.

A. – Ago en predikata verbo

1. *Indikativo*, ktp.

Tipoj: *Paŭlo ludas kun Petro, kaj vundis sin (= Paŭlon) – kaj vundis lin (= Petron).*

Ekz. *mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli ol sin mem*².

Rim. I. Oni devas atenti, ke kiel, **kiom**, ol estas subjunkcioj, kaj komencas ĉiam novan propozicion, eĉ kiam ties predikato estas neesprimita: oni devas do kompletigi la subpropozicion por kontroli, kiu estas la subjekto: *la kunvenintoj elektis lin, kiel sian reprezentanton.* (Vd. tamen sube, § 162. 3. Rim.).

Rim. II. Male la faktitivaj formoj ne estas analizataj en du apartajn verbojn (*aŭdi-igi = igi aŭdi*), sed estas rigardataj kiel unuopaj verboj: *Paŭlo farigis per sia frato sian malfacilan taskon; li sendigis pakafon al sia amiko; la abatino lernigis al ŝi sian novican preĝon.* Kp. § 119, C. 1.

2. *Infinitivo*

Tipoj: *kia revo! dormi en sia lito! (= sia propra) – dormi en ŝia lito! (aliulina).*

Ekz. *li ne sciis kion fari pri sia ĉapelo; peza mizero, certe estas eltenebila, sed senti sin malforta kontraŭ ĝi, feti sin al ĉio kaj de ĉie foriri returne kun konscio de senkapableco!*²

B. — Ago en nepredikata verbo

1. *Infinitivo*

a) la subjekto estas la ĉefverba subjekto.

Tipo: *Paŭlo rifuzis al Petro fari sian* (Paŭlan) – *lian* (Petran) *taskon*.

Ekz.: *ŝi deziras paroli kun vi en sia ĉambro*²; *ili venis por proponi al vi siajn servojn*².

b) la subjekto estas la ĉefverba objekto.

Tipo: *la sinjoro ordonis al sia servisto / vesti lin* (= la sinjoron); *vesti sin* (= la serviston).

Ekz.: *li petis min eniri en la kaverneton de lia lokomotivo* (K); *nun li skribe petas sin permesi al li veni al la kortego* (K); *Saul ne lasis lin reiri al la domo de sia patro*²; *li lasis ilin ludi kun lia sceptro*²; *Jozef ordonis al siaj servantoj-kuracistoj balzami lian patron*²; *por ke ili ne instruu al vi fari simile al ĉiuj iliaj abomenaĵoj* (Biblio).

Rim. I. Kiam la infinitiva subjekto ne estas esprimata, Z. tamen rigardas ĝin decidiga: *la imperiestro sendis voki lian* (=imperiestran) *kuraciston*². Sed lastatempe la Akademio, esplorinte la nuntempan uzadon, rekomendis, kiel pli simplan kaj logikan solvon, ne konsideri la neesprimitan subjekton de infinitivo, kaj skribi: *la reĝo sendis voki sian kuraciston*.

Rim. II. Ĉe pasiva aŭ pasiv-signifa infinitivo, oni rigardas decidiga la gramatikan subjekton kaj ne la aganton: *ŝi deziris matene ne esti ĝenata de siaj amikoj* (la subjekto de "esti ĝenata" estas ŝi, dum la agantoj estas la amikoj); *Karlo ne lasis sin bati de sia fratino*.

Rim. III. Post lasi, same kiel ĉe la faktitivaj verboj, Z. ofte rigardas decidiga la subjekton de lasi: *tiun, kiu staras tiel modeste en la angulo kaj lasas kraĉi sur sin; tiuj homoj volis... ne lasi lin kuŝi en lia ĉerko; ili ne tre volis lasi al si piedpremi la ventrojn*.

c) la infinitivo dependas de substantivo aŭ adjektivo.

Tipo: *mi admiras lian decidon / transdoni sin en la manojn de la policanoj*.

Ekz.: *la deziro de ĉiu homo eternigi sian nomon; – sed: 400 spemiloj kaj la permeso havi kun si malgrandan nevinon*²; *se al iu homo Dio donis riĉecon kaj havon, kaj donis al li la povon konsumi ilin kaj preni sian parton kaj ĝui plezuron de siaj laboroj*²; *la peno revoki en sian memoron ĉiun detalon pri sia infaneco*².

d) sendifina subjekto.

Tipo: *koni sin mem estas malfacile*.

Ekz.: *estas bele ĝui plezuron de ĉiuj siaj laboroj*²; *ne glore estas serĉi sian gloron*²; *estas ĉiam pli bone malbonigi al si la kubutojn, ol...*²

2. *Participo*

a) adverbforma.

Tipo: *korvoj ŝvebas super tiuj korpoj, esperante el ili sian nutraĵon*.

Ekz.: *ŝi kantadis melodiasn kantojn, Dangeron sian tute ne sentante*².

b) adjektivoforma. En tia okazo, la subjekto estas la substantivo determinita de la participo.

Tipo: *Paŭla vidis Martan / ludanta kun sia (de Marta) pupo – kun ŝia*

(de Paŭla) pupo.

Ekz.: *li ekvidis la anĝelon de la Eternulo, starantan sur la vojo kun glavo en sia mano^z; li estos kiel arbo, donanta sian frukton en sia tempo^z; liaj amantoj estu kiel la leviĝanta suno en sia potenco^z; lia fratino malkovris al li la koron de la memvole sin forpelinta filino^z.*

Rim. IV. Ĉe pasiva participo, oni rigardas decidiga la gramatikan subjekton de tiu pasiva formo: *li sidiĝis sur la seĝo / prezentita al li; oni diras, ke la plej altaj ĥinaj provincestroj nenion scias pri la loĝantoj de la regionoj / konfidentaj al ili^z; ŝi renkontis per sia rigardo la sur ŝi fiksitajn okulojn de Marta^z; hontigita de la trankvileco de sia edzino, la bankiero eliris (K.)*

c) neesprimita subjekto.

Tipo: *perdonta sian kapon ne zorgu pri kombilo.*

Ekz.: *sin mem konanta reĝon valoras.*

C. – Ago en substantivo

Agon povas esprimi du specoj de substantivoj: la ad-substantivoj (vd. § 31) kaj la substantivigitaj participoj.

I. *A d - s u b s t a n t i v o j .*

a) la subjekto estas esprimita.

Ekestas eta malfacilo pro la fakto, ke apud la ad-substantivo la subjekto estas montrita jen per posesivo, jen per subjekta suplemento:

1. Kiam la subjekto estas esprimita per posesivo, tiu posesivo ne apartenas al la fako de la ad-substantivo (ĉar ĝin ĝi antaŭas), kaj sekve akceptas aŭ ne la refleksivan formon laŭ la reguloj valorantaj por tiu antaŭa fako:

Tipoj: *Paŭlo amis Martan, kaj konsciis sian / amon al ŝi (de P. al M.) – sian / amon al si (de P. al P.)*

Paŭlo amis Martan, kaj konsciis ŝian / amon al li (de M. al P.) – ŝian / amon al si (de M. al M.)

Ekz.: *ŝi neniam prezentigis kun sia ludado antaŭ la mondo^z; la nova atestanto de ŝia ekzameniĝa ludado ne malgrandigis la malagrablecon^z; tio malhelpis ŝian revenon en sian hejmon.*

2. Kiam la subjekto estas esprimita per subjekta suplemento, ĝi apartenas al la fako de la ad-substantivo, ĉar ĝin ĝi sekvas, kaj la reguloj pri reflexiveco aplikiga inter la ad-substantivo kaj tiu suplemento aŭ la ĝin determinanta posedpronomo, kiu sekve neniam povas esti reflexiva (vd. § 160, II):

Tipoj: *Paŭlo amis Martan, kaj konsciis / pri la amo de ŝi al li (de M. al P.) – de ŝi al si (de M. al M.)*

Georgo vivtenas sin nur / per la subteno de liaj amikoj (la amikoj lin subtenas).

Ekz.: *ŝi vivis / el la ŝtelado de ŝia fianĉo; li konvertigis pro la konstanta admonado de lia fratino; ŝi ribelis kontraŭ la decido de ŝia patro; maltrankvila fariĝis Sara pro tiu spasme ŝprucanta gajeco de ŝia edzo^z.*

3) Kiam la refleksivo devas karakterizi objektan aŭ adjektan suplementon de ad-substantivo, nenia malfacilo:

Tipoj: *mi ne komprenas / lian fidon al li (de Paŭlo al Petro) – lian fidon al si (de Paŭlo al Paŭlo).*

Georgo vivas nur / por la subteno de siaj amikoj (Georgo ilin subtenas).

Ekz.: *nenio por homo estas pli malutila, ol nekonado de siaj posedaĵoj²; aperos la timo de ĉiu nacio pro sia ekzistado²; la literaturisto, kiu antaŭ kelke da monatoj elparolis verdikton pri ŝia desegnado².*

Rim. V. Ĉi tiu ĉapitro de la uzado de la refleksivo restis ĝis nun ankoraŭ ne plene fiksita. Tion kaŭzis du aferoj:

1. Ĉe la substantivoj sensufikse tiritaj el verba radiko, oni povas konsideri, ke la finaĵo -o signifas aŭ -aĵo, aŭ -ado; en la unua okazo, oni ofte emas trakti la substantivon kiel aĵ-substantivon, sen influo sur la uzo de la refleksivo. Jen kial oni povas renkonti kaj pravigi la du frazojn:

ŝi kompleze aŭdis la flatojn de siaj amistoj (= flataĵojn, vortojn ktp);

ŝi kompleze aŭdis la flatojn de ŝiaj amistoj (= flatadon, laŭdadon ktp).

2) Ĉe la ad-substantivoj tiritaj el netransitivaj verboj, Z. kaj multaj esp-istoj emas konsideri, ke ili ne influas la uzon de la refleksivo, ĉar pro tiu netransitiva senco, ne povas okazi konfuzo. Jen kiel klariĝas jenaj frazoj:

li funebras la morton de sia amiko; tra siaj delikataj fingroj li vidis la trabiletadon de sia sango²; ŝi ekaŭdis la susuradon de la vesto kaj de la paŝoj de sia prizorgantino²; kongresoj povas komenci uzadi ĝin por la reciproka kompreniĝado de siaj membroj².

Nian ĉi-supran konsideron de la problemo diktis la zorgo eviti ĉiajn esceptojn al la ĝenerala regulo.

b) neesprimita subjekto.

Tipoj: *ŝparo de sia mono estas plej efika rimedo por ĝin perdi.*

Ekz.: *Swicki ne estis sufiĉe antaŭzorga, por pensi pri pli malproksima estonteco, se tio postulis ian eĉ plej malgrandan rifuzon al si en la nuna momento²; ŝi respondis vive observante la enportadon de ŝiaj korboj² (= iun enportantan); la dukino atendis la reporton de ŝia braceleto (K).*

Rim. VI. Ankaŭ ĉi tie la Akademio konstatis la tendencon ne konsideri neesprimitan subjekton, kaj rekomendis skribi: *la dukino atendis la reporton de sia braceleto.*

II. Substantivigitaj participoj.

La participaj substantivoj levas apartan demandon: kvankam la participa sufikso per si mem montras agon aŭ staton, la o-finaĵo donas al la kunmetaĵo signifon de nomo: inter *servanto* kaj *servisto* la nuanco estas de metieco aŭ nemetieco, sed ne de ago aŭ neago. Tiel klariĝas, ke tiuj participaj substantivoj estas praktike rigardataj ne kiel ad-, sed kiel aĵ-substantivoj, kaj sekve ne influas la uzon de la refleksivo: *ĉiu el ni sur la tero havas siajn adorantojn (K.)* (sed oni dirus: *havas kelkajn adorantajn lin*); *kiel ŝafo muta antaŭ siaj tondantoj²; la oportuneco, kiun ĝi (la lingvo) havos por siaj propraj uzantoj²; la aŭtoro ŝajne mokas la legantojn de sia libro.*

D. — Ago en adjektivo

Tipoj: *Paŭlo vivas kun edzino / tropostulema por si (por la edzino) – por li (por Paŭlo).*

Jam blindiganta, li volis viziti tiun muzeon faman pro siaj pentraĵoj (la p. de la muzeo) – pro liaj pentraĵoj (la p. de li).

Ekz.: *ne aŭskultu la vortojn de sorĉistoj kiel ajn lertaj en sia arto^z; la registaroj trovos la demandon de lingvo internacia / inda je ilia enmiksiĝo^z.*

Rim. VI. Kiam la adjektivo estas substantive uzata (vd. § 74), Zamenhof aplikas la saman regulon, kiel pri la substantivigitaj participoj, t.e. ĉe li tia adjektivo ne influas la uzon de la refleksivo: *por ĉio verkita kaj por ĉio improvizita, ili ne havas egalajn al si en la mondo; tiu Maja stango certe ne havas similan al si sur la tuta tero (= egalulojn, similaĵon).*

Rim. VII. La adverbo ne influas la uzon de la refleksivo: *li kantas bele por si sed ne por mi; li faris longan pledadon favore al sia kuzo (sed: li faris longan pledadon favoran al lia kuzo!).*

Notinde, ke ankaŭ la prepoziciaĵoj ne influas la uzon de la refleksivo, eĉ kiam ili esprimas agon: *li povis esti savata nur pere de sia onklo; oni ne liberigis lin spite de liaj protestoj; tiu teorio postulas la regadon de la popolo fare de si mem.*

Pliampleksigo de la refleksivo

162

La regulo formulita sub § 160. III. dependigas la uzon de la refleksivo de la esprimo de ago: sekve la substantivoj ne signifantaj agon ne influas tiun uzadon: *li trovis la leteron de sia filo.*

Tamen la natura sekvo de la regulo estas la diserigo de la propozicio en malgrandajn vort-grupojn: kaj oni estas rapide alkondukita al tia kutimo, ke en propozicio iom longa, eĉ se ne aperas ag-vorto, oni emas dividi tiun en plurajn fakojn, kaj uzi la refleksivon nur interne de ili. Tiel oni povas ekspliki la sekvantajn okazojn:

1. **S u b s t a n t i v a e p i t e t o.** Z. ordinare rigardas la substantivan epiteton sendependa fako:

Tipoj: *li insultis la pastron, / lian instruiston.*

Ekz.: *ili ne defalis de la Eternulo, Dio de iliaj patroj^z; ili forlasis la Eternulon, ilian Dion^z; li (Jozef) ekvidis sian fraton Benjamin, la filon de lia patrino^z (= de la patrino de J.).*

2. **S u b s t a n t i v a s u p l e m e n t o.** Kiam substantivo estas suplemento de alia suplemento aŭ de adjekto, Z. rigardas tiun duan suplementon sendependa fako:

Tipoj: *li trovis la leteron de la kamarado / de lia filo.*

Ekz.: *la popolo ne turnis forte sian koron al Dio / de ĝiaj patroj^z; ĉiu el la Izraelidoj devas resti ĉe la posedaĵo / de la tribo de liaj patroj^z; iu filino devas edziniĝi kun iu el la familio / de la tribo de ŝia patro^z; liaj filoj kaj liaj filinoj estis manĝantaj kaj trinkantaj vinon en la domo / de ilia unuenaskita frato^z; sufero kiun la Eternulo ĵetis sur min en la tago / de lia flama kolero^z; en la tria jaro / de lia reĝado / li faris feste-*

non por ĉiuj siaj princoj^z.

3. **S u b s t a n t i v a p r e d i k a t i v o.** La tendenco de Z. kaj de multaj verkistoj estas rigardi tiun predikativon sendependa fako:

Tipo: *ili elektis lin / ilia gvidanto.*

Ekz.: *la reĝido, kiu nomis la reĝidinon / lia amata trovitino^z; la Eternulo bonvolis / fari vin / Lia popolo* (Biblio).

Tiu lasta uzo estas analoga al la uzo de la refleksivo kun participa predikativo (§ 161, B, 2, b): *ili vidadis la nubojn / preterflugantaj profunde sub ili^z.*

Rim. I. Tiu tendenco estas tiel forta, ke eĉ post kiel Z. evitas ofte la refleksivon: *li rigardis min kiel lian malamikon^z* (dum la akuzativo de *malamikon* bone pravas, ke oni devas restarigi la verbon: *kiel – li rigardus – sian malamikon*; sed li estis puŝita de la analogio al: *li rigardis min / lia malamiko*); *tiujn verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardis ĉiam, / kiel leĝojn por li^z; Li donis ilian landon, / kiel heredon al Lia popolo^z.* Tiu dirmaniero ne estas imitinda.

La tri ĉi-supraj reguloj ne estas ankoraŭ starigitaj, kiel nepravaj: oni povas trovi, eĉ ĉe Z., plurajn esceptojn el ili. Tamen ili meritas esti obeataj, ĉar ili estas konformaj kaj al la estkialo de la refleksivo, kiu estas nur la bezono de klareco, kaj al la fundamenta tendenco de la lingvo, sendependigi unu de la alia la sinsekvajn fraz-unuojn. Cetere Z. tre konscie rezervis la agliberecon pri tiu sintaksa punkto: en la "Oficiala Gazeto" (Junio 1909) Grabowski, tiama Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko, skribis: "Pri la frazoj cititaj mi demandis D-ron Zamenhof. Li konsentas, ke si, sia estus en ili pli korekta, ekz-e en la frazo: ... *kaj ke tiu, kiu estos la kaŭzo de tio, ricevu justan punon por lia krueleco*, sed D-ro Z. uzas *li, lia*, kiam la pronomo ne sekvas tuj la subjekton, sed estas apartigita per aliaj substantivoj, kaj tial povus okazi dubo pri la ĝusta rilateco kaj senco". Trafa ekzemplo (des pli trafa, ke temas ne pri intermetitaj substantivoj, sed nur adverboj) estas la du paralelaj frazoj jenaj, fine de du sinsekvaj paragrafoj:

– *Nur la sep vortoj... ne povas esti uzataj en nova formo, sed devas esti uzataj ĉiam ekskluzive nur en ilia malnova formo.*

– *Nur la vortoj unusilabaj devas ĉiam resti nur en sia malnova formo.* (Leteroj de Z. I. p. 249).

Oni do povas kompletigi la ĉi-supran (§ 160) uzregulon de la refleksivo per jena restrikto:

Preferinde ne uzu la refleksivon, se ĝi estas apartigita disde la koncerna subjekto per pli ol tri fraz-elementoj (predikato – objekto – suplemento aŭ adjekto).

Rim. II. Kiel ni diris ĉi-supre, Z. kelkfoje ne uzis la refleksivon, ĉar la ordinara pronomo aŭ pronom-adjektivo ŝajnis al li pli kontrastodona: *li estis alkalkulita al krimuloj, dum li portis sur li la pekon de multaj; la ĥino... legas siajn skribajn signojn ĉiam en sia dialekto kaj la aliaj popoloj de Azio legas tiujn samajn signojn en ilia lingvo.* Sed tiaj maloftaj okazoj ne malvalidigas la ĝeneralajn regulojn ĉi-supre eksplikitajn; oni do ĉiam observu tiujn, se nur la klareco ne postulas malobservon.

La reciprokeco

163

Ĝi estas ligita al la refleksiveco. Per ĝi oni esprimas, ke ĉiu el du aŭ pluraj agantoj same agas kontraŭ la aliaj, kiel tiuj agas kontraŭ li. La reciprokeco estas esprimata en Esperanto per tri rimedoj:

1. per la esprimo *unu la alian*, kiun oni adaptas al la resto de la propozicio akordigante *unu* kun la subjekto, kaj *la alian* kun la objekto aŭ adjekto de la predikato: *komprenante unu la alian, la popoloj...^Z; tiuj fratoj fariĝas tute fremdaj unuj al aliaj^Z; ili kuris la unuj post la aliaj; iliaj vizaĝoj estis unu kontraŭ la alia^Z; oni ne vidis unu alian^Z; ne trompu unu alian^Z.*

La reciprokeco povas ankaŭ koncerni la objekton: en tia okazo *unu* restas nevaria, sed *unuj* alprenas la akuzativan -n: *li kunigis kvin tapiŝojn unu kun la alia^Z; la registaroj fetas la homojn unujn kontraŭ la aliajn.*

Rim. I. Oni devas atenti, ke kun tiu esprimo oni neniam almetas la refleksivon, kiel povus emi franclingvanoj: *ili amas unu la alian* (ne: *ili amas sin unu la alian!*).

2. per la adverbo *reciproke*: *reciproke batalantaj nacioj.*

Rim. II. Male al la antaŭa okazo, oni volonte almetas la refleksivon apud tiu adverbo: *ĉiuj sin reciproke komprenas^Z; ili furis al si reciproke^Z; ili reciproke turnas al si la dorson.*

3. per la esprimo *inter si*, kiu egalvaloras "unu kun la alia": *la judoj edziĝas inter si; vivi inter si harmonie^Z; tiuj konsiliĝas inter si^Z; por ili estus tre utile komunikiĝadi inter si^Z.*

Rim. III. En tre maloftaj okazoj *Z.* uzas la refleksivon solan por esprimi reciprokecon: *bono kaj vero renkontiĝas, justeco kaj paco sin kisas^Z; sinjoroj sin batas, servantoj vundojn ricevas^Z.* Sed tio estas ebla nur, kiam la ĉirkaŭteksto ne allasas konfuzon, kaj sufiĉe klare esprimas mem la reciprokecon.

SENSUBJEKTAJ PROPOZICIOJ

164

Fine de la studo pri la subjekto, ni devas mencii la sensubjektajn propoziciojn. Ĉar ekzistas frazoj, en kiuj nenia subjekto estas esprimita. Ni devas distingi du okazojn:

1. la subjekto regule ne estas esprimita, sed oni povus ĝin esprimi, se oni bezonus. Tio estas la regula formo de ĉiuj volitivaj ĉefpropozicioj en la dua persono: *ŝiru rozojn en somero!^Z konservu bone la sekreton^Z* (kp. la poezian nekutiman formon: *vi legu en la libro^Z*). Tamen estas uzata subjekta pronomo por eviti sencodubon: *"Do vi ne estu dubantoj!"* (ĉar sen *vi*, oni povus kompreni *dubantoj* kiel subjekton). La saman okazon oni trovas ĉe la ordonaj propozicioj infinitivaj: *ne kraĉi teren!* (= *oni ne kraĉu!*)

Tio estas fine la okazo de la verbo "*ŝajnas*", uzata interne de alia propozicio: *jen, ŝajnas, ili!*; de *plaĉas* en la esprimoj: *se plaĉas al vi kaj: kiel plaĉas al vi.* Kp. § 154, Rim. kaj 167 a) Rim.

Rim. I. Oni ne devas konfuzi ĉi tiun okazon kun tiu de la verboj, kies subjekto konsistas el subpropozicio: *ŝajnas al mi, ke vi estas malprava.*

2. la subjekto ne estas esprimita, ĉar fakte la koncerna verbo ne vekas la ideon de aganto. Tio estas la okazo kun ĉiuj verboj esprimantaj meteorologiajn fenomenojn: *pluvas, neĝas, hajlas, fulmas, tondras* ktp., *tagiĝas, vesperas* ktp. — aŭ fizikan impreson: *estas varme, komforte* ktp. aŭ konvenecon: *estas bele, dece, inde, necese, bezone, dezirinde, eble* ktp. (kiam ne sekvas ilin subjekta subpropozicio!).

Tio estas ankaŭ la okazo de la verbo "temas", uzata kun la signifo: "la temo, la demando estas pri": *ne temas pri konsilo, sed pri ordono.*

Rim. II. Ankaŭ tiuj lastaj verboj povas okaze esti uzataj kun subjekto: *benoj pluvas sur ilin* (B); *kugloj hajlis; la libro temas pri politiko.* Cetere, el tiuj verboj la ideo pri aganta subjekto ne estas tute forigita: oni ja skribas: *komencas neĝi*² (analoge al: *iu komencas kraĉi*); dum, se la verbo estus konceptita kiel plene sensubjekta, oni devus diri: *komenciĝas neĝi*, same kiel oni diras: *komenciĝas neĝado.*

LA PREDIKATO

Ni vidis ĉi-supre (§ 152), ke oni devas, ĉe la studo de la predikato, distingi du tipojn, tiun de la ag-propozicio kaj tiun de la ec-propozicio.

A. — LA AG-PROPOZICIO

Difino

La plej simpla formo, per kiu oni povas esprimi ideon pri ago, estas eĉ ne gramatika: ĝi estas la instiga interjekcio. Oni ordonas silenti per *ŝŝ!* aŭ *ĉit!*, oni ekpaŝigas ĉevalon per *hot!* ktp. Je iom pli kompleksa grado, oni trovas la saman ideon esprimitan per adverbo, kiu, kvankam apartenanta al la sistemo de la lingvo, havas malpli gramatikan valoron ol variiva vorto: oni instigas al ago per *ek!*, al foriro per *for!* Pli supre staras la okazoj, kiam la ideo pri ago estas esprimita per variiva vorto, kiu ne estas ĉiam verbo, sed povas esti derivita adverbo, substantivo aŭ volitivo: oni pelas hundon el siaj genuoj per: *teren!*, oni dankas per: *dankon!*, oni pelĉasas ŝteliston per: *kaptu!*²

Kun la volitivo ni tuŝas al la verbo, kiu estas jam iom kompleksa stato de pensado; la volitivo mem kaj la infinitivo estas la plej simplaj formoj en la verbo: *ne fumu! ne elklini sin!* (ŝurskriboj en vagonoj). Fine ni atingas la plej altan gradon de komplekso, kiam anstataŭ simple ordoni, ni konstatas aŭ fikcias, t.e. kiam ni uzas indikativon aŭ kondicionalon. La propozicio, eĉ tiam, povas konsisti el unu vorto: *pluvas*, aŭ el sola verbo kun adverbo: *baldaŭ fulmos.* Sed plej ordinare la ag-propozicio postulas la esprimon de la subjekto kaj de la predikato: *la horloĝo haltis; Petro volonte dormus.* Eĉ, kun la transitivaj verboj, la ag-propozicio estas kompleta nur, se al la du antaŭaj elementoj almetiĝas la objekto: *mi streĉas la horloĝon; Petro volas dormi.*

Rim. Oni vidas, el tiu klasado de la ag-propozicioj, ke la sola esenca elemento estas la esprimilo de la ago, kiun oni gramatike nomas predikato. Ĝi povas stari sola,

ĝi povas eĉ ne esti verbo: en frazoj kiel: *la kapoj dekstren!* oni devas analizi: *la kapoj* = subjekto, *dekstren* = predikato (adverba). Estus kontraŭe al la vera irado de la penso, se oni en tiaj frazoj subkomprenus tian aŭ alian verbon.

Ne normalaj ag-propozicioj

166

1. *Infinitivaj*

Ni vidis (§ 117. 1.), ke la predikata verbo povas ifoje stari en infinitivo, anstataŭ indikativa futuro, kondicionalo aŭ volitivo. Tio okazas ĉe frazoj esprimantaj heziton aŭ dubon, sub demanda aŭ ekkria formo. En tiu okazo la subjekto ne estas esprimita (§ 154, 2.).

a) demanda formo. La demandeco povas esti esprimita per demanda adverbo aŭ pronomo: *ĉu esti aŭ ne esti?*² *kiel stari trankvile kontraŭ tioma malfeliĉo?*² *Kion fari?*² aŭ per la tono de la frazo: *eble el la vestoj ion forkomeri? Vendi ekzemple la pantalonon?*²; *ho vi, Ĉielo, Tero! Eble ankaŭ l' Inferon voki?*² *li preĝas... nun, mortigi lin? Sed tiam...*²

b) ekkria formo: *plialtigi la temperaturon de la ĉambro! Per kio? Aĉeti medikamentojn? Per kio?*² ... *planti en tia aĝo!*

Rim. Oni ne konfuzu tiun uzon kun la infinitivo esprimanta ordonon: *ne ekpepi!*² *ne movi la buŝon!*² Pri predikataj infinitivoj en subpropozicioj, vd. ĉe la apartaj subprop-oj.

167

2. *Elipsaj*

En la konversacia lingvo okazas ofte, ke la ag-propozicio ne estas kompleta. Povas manki:

a) la s u b j e k t o: *for la neŭtralismon! alten la piedon!*² *"Eliris, sed baldaŭ revenos" oni respondis de supre?*²; *fianĉiĝis, por ĉiam ligiĝis?*²; *staris, ekfaris?*²; *atendis, atendis, ĝis lin ĉerko etendis?*².

Rim. I. Ni ne parolas tie ĉi pri la regule sensubjektaj formoj (§ 154, Rim. kaj § 164). Cetere, la supraj sensubjektaj formoj ekde la tria ekz-o estas uzataj nur en proverboj aŭ rapida parolo; ili tute ne estas kutimaj aŭ konsilindaj en la ordinara prozo.

b) la p r e d i k a t o. Ĝi povas esti:

jen simple ne ripetita; tio okazas precipe ĉe respondoj, en dialogo: *kiel malalten mi falis! Kaj por kio? Kaj por kia kulpo?*² ... *mi vokos al vi la mastron mem!* – *Por kio do la mastron?*²; *vi donu al ŝi la eblon labori.* – *Mi, al ŝi, la eblon labori? Sed kiamaniere, mia kara?*²; *la vizaĝon de ĝiaj juĝistoj Li kovras. Se ne Li, tiam kiu?*²; *nu, rakontu: kio kaj kiel?*²

jen tute ne esprimita, precipe en proverboj: *ĉiu por si mem?*²; *ĉiu sezono kun sia bono?*²; *multe en kapo, sed nenio en poŝo?*²; *kie timo, tie honto?*²; *"ĉiam tio sama!" ŝi ripetis?*²; aŭ en priskribaj frazoj, asertantaj simple la ekziston de io en iu loko aŭ tempo: *sur la strato, bruo kaj tumulto; en la palaco, dezerto kaj silento.*

c) la s u b j e k t o k u n e k u n la p r e d i k a t o. En tiu okazo, nur la indiko de la akuzativo (aŭ prepozitivo) montras, ke ne temas pri simpla ekkrio, sed pri frazo, el kiu oni eldiras nur la ĉefan parton:

iom de ĉio, nenion fundamente... ĉion por ornamo kaj bagatelaĵoj, nenion por utileco!²; ho, mia Dio! ekĝemegis la virino, nur ne tion! Ĉion, kion vi volas, nur ne tion!²; ĝis kiam, Sinjoro, ĝis kiam?²; hodiaŭ al mi, morgaŭ al vi².

Tio okazas precipe ĉe mallongaj, preskaŭ adverbaj esprimoj: *nu, diris la virino en la atlasaĵoj, ĉu ne?²; dankon!² silenton!² pardonon!² vorton de honoro!² bonan matenon!² ĝojan feston!²*

Rim. II. En la elipsaj prop-oj oni uzu akuzativon nur en la sekvantaj okazoj:

1. kiam la prop-o devas esti kompletigita per: *mi (oni) esprimas, donas, prezentas, volas, deziras* (vd. la ekzemplojn sub c.).

2. Kiam la akuzativo sekvas el la antaŭa frazo: *mi vidis ion – Kion?*

Cetere, oni subkomprenu ĉiam la predikaton *estas* aŭ *okazas (-is)* kaj uzu la nominativon: *kio nova? kio en via mano? ĉu multaj pakaĵoj? kioma horo? furioza salto, kaj li jam estis sur la strato.* Se oni ellasas *kio estas...* en demanda prop-o, oni same uzu nominativon (predikativo) kaj la demandon oni esprimu nur per voĉtono, ne per ĉu: *mi scias jam la jaron de la okazaĵo; sed la dato?* (la demanda vorto ja estas la elipsa *kia*).

B. – LA EC-PROPOZICIO

Kontraste kun la ag-propozicio, kiu povas konsisti el ununura vorto, la ec-propozicio konsistas ĉiam almenaŭ el du elementoj: el la io, pri kiu oni parolas – t.e. la subjekto, kaj el la esprimo de ties kvalito, t.e. la predikato. Ekz-e: *la domo estas blanka* – ĉi tie *la domo* estas la subjekto, kaj *estas blanka* estas la predikato.

Kiel oni vidas, en tiaj okazoj la predikato estas kompleksa. Ĝi konsistas el du partoj: el la kvalitesprima parto, kiu portas la propran senco de la predikato (*blanka*), kaj kiun tial oni povas nomi *predikativo*; kaj el verba ligilo (*estas*), kiun oni nomas *kopulo*. Ni studos aparte tiujn du terminojn (pri la subjekto ni jam parolis en la §§ 153–160).

La predikativo

1. La predikativo povas akcepti diversajn formojn:

a) *A d j e k t i v o*. Tio estas la plej ordinara okazo. La predikativa adjektivo akordigaŭs nombre kaj kaze kun la subjekto: *leono estas forta²; la dentoj de leono estas akraj².*

Aparta apliko de tiu regulo estas la kompleksaj tempoj, aktivaj kaj pasivaj: *mi estas lavita; ni estas lavitaj.*

Iafoje la akordon regas ne la formo, sed la senco. Tio povas okazi:

aa) ĉe kolektivaj vortoj (vd. § 33, C.): *al tiu aŭ alia gento vi donos la rajton esti mastroj²;*

Pri la kolektivsenca oni, vd. § 48.

bb) ĉe opaj subjektoj konsistantaj el frakcisignifa nomo kaj el plurala suplemento: *parto de la posedantoj estos ne akurataj²; certa nombro da akcioj estu pagataj...²; la granda plimulto da individuoj restos naciemaj kaj absolutemaj.* Post *multe da* la predikativo staras en singularo, se

168

169

temas pri abstraktaĵoj: *en certaj okazoj multe da saĝo estas pli malbona, ol se oni ĝin tute ne havas²*; en pluralo, se pri konkretaĵoj: *multe da larmoj estis ploritaj pri la mortinta birdo²; tie ĉi estis akceptitaj multe da tre gravaj gastoj²*.

cc) ĉe frazo, kiu laŭsence entenas duoblan subjekton, sed kie unu el ili estas esprimita alimaniere: *egale senkaŭzaj estas la tro granda ĝojo kiel ankaŭ la malĝojo²* (la penso estas: *tro granda ĝojo kaj malĝojo*).

Rim. I. Kiam la subjekto estas infinitivo aŭ propozicio, aŭ tute ne ekzistas (§ 164. 2.), la adjektiva predikativo alprenas la adverban-neŭtran finaĵon -e (vd. § 68. Rim.): *resti kun leono estas danĝere²* (kp.: *la restado kun leono estas danĝera*); *se rigardi min estas por vi tiel malagrabla...²*; *estus tre bele, ke mi iru al la fonto²*; *ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme?² ĉie estas tiel silente!²* La sama regulo aplikigas nature al la pasiva participo uzata predikative: *estas malpermesate fumi ĉi tie; estas konate, ordonite, rekomendite, ke...; estu sciate al la reĝo, ke la Judoj rekonstruas...²*; *estis decidite, ke ĝi restu nun en la kortego²*.

Oni atentu, ke kroma adverbo, se tia ekzistas, ne staru apud la adverbforma predikativo: *estus danĝere nesingarde publikigi tiujn leterojn* (ĉu temas pri danĝera nesingardo aŭ pri nesingarda publikigo?). En tia okazo la unuan sencnon oni neprigu per la antaŭmeto de la infinitivo: *publikigi estus danĝere nesingarde*; kaj la duan per la intermeto de la infinitivo: *estus danĝere publikigi nesingarde...* Anstataŭ estas eble eble oni diru: *tio povas esti ebla*. Sed en kompleksa frazo, kie tiaj rimedoj estus neoportunaj, oni ne timu uzi la adjektivan formon: *por mi persone estus kompreneble multe pli oportuna teni la sorton de la lingvo en miaj manoj²*; *estus tre utila tute precizigi kaj klarigi la rolon de la Oficejo²*.

Rim II. En tiaj okazoj la predikato estas ĉiam esti aŭ iĝi (ekesti): *iĝis varme*. Sed ili devas esti *veraj* predikatoj; kiam ili estas infinitivaj komplementoj de alia predikato aŭ de moda helpverbo, oni devas uzi la a-formon: *pli bone estus esti nenaskita; necesas esti certa pri tio; povas esti ebla, ke li ne venos*. (Vd. ankoraŭ § 173, Rim. I. kaj § 232, Rim. IV).

Ŝajnas povas esti rigardata kiel elipsa esprimo subkompreniganta esti (= ŝajnas esti). Tial post ĝi la adjektiva formo estas preferinda: *eble ŝajnos stranga, ke...²*

Kompreneble, la adverbforma formo povas esti anstataŭigata ankaŭ per substantivo: *estas feliĉo, ke...; kaj eĉ de substantive uzata adjektivo: kvankam la plej bona estus silenti pri ili²* (= la plej bona afero).

b) *S u b s t a n t i v o*. Ĝi akordigas nombron kaj kaze kun la subjekto: *rozo estas floro²; rozoj estas floroj²*; sed nur kaze, se la predikativo estas abstrakta vorto, signifanta kvaliton komunan al ĉiu el la subjektoj: *la rozoj kaj la siringoj estas la ornamo de la tuta lando*.

Ankaŭ ĉe substantiva predikativo povas okazi akordo laŭ la senco: *via idaro estos fremduloj en lando, kiu ne apartenos al ili²*.

Rim. III. En frazoj kiel: *hodiaŭ estas dimanĉo²; estis vespero²*; estas pli ĝuste rigardi la substantivon subjekto: la verbo esti havas tiam propran valoron kaj signifas la ekziston.

c) *Prepozitivo*. Ĉiuj manieraj suplementoj povas esti ligitaj al la subjekto per kopulo, kaj tiel fariĝi predikativoj: *mia frato estas de meza*

kresko^z; tiu libro estas de Renan; ĉu tiu glaso estas por mi?

d) *I n f i n i t i v o*. Oni povas trovi ĝin post la kopulo estas: *ŝin ekvidi estas ami sole ŝin kaj ĉiam flami; la elekto estas por vi venki aŭ morti*. Pli ofte ĝi sekvas la kopulon ŝajnas: *dormi li ŝajnas; ĝi ŝajnis esti garnita per mil okuloj^z; li ŝajnas heziti*.

2. La predikativo povas esti konstruita en du manieroj: rekte, kiel en ĉiuj antaŭaj ekzemploj kaj nerekte, helpe de la subjunkcio kiel en la sekvantaj okazoj:

a) kiam la predikativo estas infinitivo: *por li delogi knabinon estas kiel krevigi nukson^z*.

b) kiam la kopulo estas unu el la verboj *aperi, aspekti, mieni* kaj la pasivaj verboj esprimantaj opinion: *esti rigardata, rekonita, kulpigita* ktp. aŭ konduton: *esti elektita, traktita, kronita* ktp.: *miaj rimedoj de solvo aperos eble kiel tro simplaj al la leganto^z; tia ŝanĝo aperas kiel tute ne akceptebla^z; tio aspektas kiel pura sensencaĵo; li mienas kiel malsanulo; tiuj naivaj kontraŭparoloj estis rigardataj kiel veroj^z; li estis kulpigita kiel ŝtelisto; Dante estis rekonita kiel la plej granda poeto en lia jarcento; li estis traktata kiel krimulo*.

Oni rimarku, ke en tia okazo, oni uzas kiel precipe antaŭ substantivo: *tio montriĝis kiel eraro* (sed: *tio montriĝis erara*).

La kopulo

1. En la plej simpla formo de la ec-propozicio tute ne ekzistas kopulo. Tia tipo, kvankam ne regula en Esperanto, ekzistas tamen, precipe en proverboj: *pli bona io, ol nenio^z; kio mia, tio bona^z; farita via faro, nun adiaŭ, mia kara!^z* kaj en kelkaj formuloj, en kiuj la subjekto estas la sekvanta propozicio kaj la predikativo estas adverbforma: *terure, kiel mi volas manĝi!^z domaĝe, ke li estas vere kompetenta; ne mirinde, ke oni ne elektis lin; kompreneble, ke mi lin amas!^z* krome en la poezio (la elipson montras inversio): *Glora la celo, sankta l' afero!^z* Tion fari oni povas nur en okazo, kiam la verbo esti starus en indikativa prezenco.

2. Ĉe la ekzisto de kopulo, la plej malalta grado de komplekso estas la tipo konstruita per esti, kiu estas la plej sensignifa kopulo: *temp' estas mono^z; la papero estas blanka*.

Rim. I. Oni devas atenti, ke kelkfoje la verbo esti intime ligiĝas al la predikativo, kaj la grupo havas la efektivan valoron de ag-verbo: tio estas la okazo ĉe la malsimplaj aktivaj tempoj: *li estas mortiginta = li mortigis*; tio povas okazi ĉe la pasivaj tempoj: *li estis mortigita = oni mortigis lin* (sed tie povas esti ankaŭ vera ec-propozicio: *li estas mortigita = li estas en stato de morto*. Vd. § 114). Tio okazas fine ĉe kelkaj adjektivoj: *esti ema, favora, inklina = emi, favori, inklini*.

3. Iom pli kompleksa estas la uzado de aliaj kopuloj, kiuj ne tute perdis sian propran signifon. Ili efektive povas esprimi:

a) la komencon de nova stato: *iĝi, fariĝi, montriĝi, troviĝi; esti elektita,*

nomita, balotita ktp.; nevo de papo facile fariĝas kardinalo^z; li estis balotita deputito.

b) la daŭron en sia stato: resti, konserviĝi: ĝibulo ĝis morto restos ĝibulo^z; la gloro de siaj patroj, kiu en la daŭro de sep jarcentoj konserviĝis senmakula^z.

c) la ŝajnon: aperi, aspekti, ŝajni, mieni, vidiĝi; esti rigardata, traktita, trovata: li aperis mensoganto^z.

4. Plej kompleksa estas la sekvanta formulo, en kiu adjektivo aŭ substantiva predikativo estas ligita al la subjekto per ag-verbo. Tio prezentas iel la kuntiriĝon de du propozicioj en unu solan: la unua signifas la agon: *ŝi dancas*, kaj la dua la econ, kiun la subjekto posedas nur okaze de tiu ago: *ŝi estas nuda*; tiujn du propoziciojn oni miksas en: *ŝi dancas nuda*. Ekzemploj de tiu miksa ec-propozicio estas: *Aristido mortis malriĉa; mi naskiĝis mizerulo*. Temas tie pri adjekta predikativo.

Rim. II. En tia okazo la predikativo havas signifon tre proksiman al tiu de adverbo: la diferenco estas, ke tiu predikativo priskribas la staton de la subjekto en la momento, kiam li agas, dum la adverbo priskribas la manieron de la agado mem; kaj ambaŭ ideoj ne estas ĝuste la samaj. Se mi diras: *ŝi edziniĝis malriĉa*, mi komprenigas, ke ŝi estis malriĉa, kiam ŝi edziniĝis (sed ŝia edzo eble estis riĉa, kaj sekve, ankaŭ la edziĝo); sed se mi diras: *ŝi edziniĝis malriĉe*, mi komprenigas, ke ŝia edziniĝo mem estis malriĉa (kvankam ŝi persone povus ne esti tia). (Kp. § 197, Rim.).

C. — LA ATRIBUADO

171

Ni studis ĝis nun la plej oftan manieron esprimi econ aŭ agon, kiam oni prezentas ilin kiel faktojn neprajn, senkondiĉajn. Se mi diras: *la knabo ludas* aŭ: *la vino estas bona*, mi asertas la ludadon aŭ la bonecon kiel nediskuteblajn verojn. Sed alifoje, ni volas insisti, ke tiuj asertoj estas propre niaj, ke ni respondumas ilin, aŭ ke ili povas ne esti konsentitaj de aliaj personoj. Alivorte, inter la fakto kaj la alparolato ni intermetas nian personon, rilatigante al ĝi nian parolon; kaj anstataŭ simple konstati fakton, ni atribuas ĝin al la koncarnato. Tiam ni diros: *mi vidas la knabon ludi* aŭ: *mi trovas la vinon bona*. Tiun apartan metodon de parolado ni nomas *atribuado*. Logike, ĝi egalvaloras du apartajn propoziciojn, kiujn ĝi sintezas en unu solan: *mi vidas — ke la knabo ludas; mi trovas — ke la vino estas bona*. Gramatike, ĝi prezentas kompleksan aspekton, kaj konsistas el: 1. subjekto de la asertanta verbo; 2. predikato esprimanta la aserton; 3. objekto de la predikata verbo, kiu estas samtempe subjekto de la predikativo; 4. predikativo, adjektiva aŭ verba, rilatanta al la objekto. Tiun predikativon, por distingi ĝin de la ĉi-supre studita, oni nomas *objekta predikativo* (aŭ *atribua predikativo*).

La karakteriza trajto de tiu dirmaniero estas, ke la objekto regule staras en akuzativo, dum la rilatanta al ĝi predikativo staras ĉiam en nominativo (krom se ĝi estas infinitiva, kompreneble). Ĝuste la kontrasto, inter tiu nominativa determinanto kaj la akuzativa determinato, signas por la

orelo la predikativan signifon de l' antaŭa. Tio konsistigas unu el la plej klaraj ekzemploj de la finaĵo nula: la manko de la *-n* ludas rolon tiel gravan, kiel rolus la ĉeesto de speciala finaĵo aŭ prepozicio (Kp. §§ 32-34 kaj 132, I. 3.). Cetere, la predikativo akordiĝas nombre kun la objekto: *oni nomis lin fripono* – *oni nomis ilin friponoj*. Ni studu aparte, kiajn formojn alprenas en la atribua parolado la ag-propozicioj kaj la ec-propozicioj.

Atribua ag-propozicio

Oni trovas ĝin ĉe la predikataj verboj, kiuj esprimas la perceptadon de la sensoj: *vidi, rigardi, aŭdi, aŭskulti, senti*. La predikativo havas partipan (nominativan) aŭ infinitivan formon. La infinitivo, kvankam pli malofta ĉe Z., estas tamen preferinda: *ne aŭdu vian sklavon malbenanta vin^z; li sentis sin tuj falonta^z; la esperojn de mia vivo mi devis vidi forfali en la abismon^z; mi aŭdis la bebon krieti; en la modernaj pentraĵoj ni vidas la imiton de la naturo aŭ de la vivo, alivorte la temon, fariĝi pli kaj pli akcesora*.

Rim. I. Kun tiuj predikativoj, la uzado estis longatempе ŝanceliĝema, kaj en la primitiva literaturo oni trovos multajn ekzemplojn de predikativaj participoj en akuzativo; tio estas severe evitinda. Frazo kiel: *ŝi ekvidis siajn fratinojn leviĝantajn el la maro^z* (1889) ŝajnus hodiaŭ nekorekta kaj devus esti ĝustigita en: *leviĝantaj aŭ leviĝi*.

La participo, rilatanta al la objekto de tiaj verboj, akordiĝas kun ĝi nur, kiam ĝi estas epiteto, t.e. kiam ĝi esprimas akcesoran kvaliton aŭ cirkonstancon, kiu ne estas la materio mem de la percepto, ekz-e: *tiam mi ekaŭdis voĉon, sonantan el la fumo de la roko^z; kaj la virino diris al Saul: Iun dian mi vidis leviĝantan el la tero^z; ĉu vi vidas tiujn naĝantajn bastonojn?* Pri la elekto en dubaj okazoj, vidu § 174.

Cetere ne estas dubo, kiam la participo aktiva staras en preterito aŭ futuro: ĝi ĉiam akordiĝas, ĉar percepto povas esprimiĝi principe nur per prezenca participo.

Krom la verboj de perceptado, oni trovas atribuan ag-propozicion ankaŭ ĉe la verboj *igi* kaj *lasi*. Ĉe ili, la predikativo plej ofte alprenas infinitivan formon: *igi la ĉevalon manĝi; lasi iun foriri*. Pli detale vd. § 119. C.

Rim. II. Atentu pri la diferenco inter adverba adjekto kaj objekta predikativo. La unua karakterizas la agon: *li juĝas sin senerare* (lia juĝo pri si estas senerara); *mi sentas min bone* (mia farto estas bona). La dua karakterizas, helpe de la predikato, la objekton: *li juĝas sin senerara* (laŭ sia juĝo li estas senerara); *mi sentas min bona* (laŭ mia sento mi estas bona).

Atribua ec-propozicio

Oni trovas ĝin ĉe la predikataj verboj, kiuj signifas:

1. atribui per penso: *kredi, juĝi, pensi, opinii, rigardi, ekkoni, rekoni, kalkuli, estimi, taksi, ŝati, kompreni, trovi, deziri, scii, memori* ktp.

172

173

2. atribui per parolo: *nomi, deklari, aserti, bapti, insulti, proklami, konfesi, atesti, trovi* ktp.

3. atribui per ago: *elekti, krei, baloti, igi, fari, lasi, kroni, prezenti, pentri, skulpti, desegni* ktp.

La predikativo estas plejofte adjektiva, kelkfoje substantiva; ĝi povas esti rekta aŭ nereкта.

I. Rekta predikativo.

Ni klasas la ekzemplojn laŭ la supraj dividoj:

1. *ĉu vi sentas vin sana?*² *mi sentis min ia fremdulo*²; *la publiko kutimas opinii ĉiun atakanton bravulo kaj ĉiun atakaton kulpulo*²; *oni ne povas rigardi neekzistantaj tiujn faktojn; kia oni vin vidas, tia oni vin takas*²; *oni ne devas rigardi la vivon grava; mi memoras vian patrinon tia, kia ŝi estis antaŭ tridek jaroj.*

2. *ne nomu min reĝido, sed amiko*²; *por hundon dronigi oni nomas ĝin rabia*²; *oni ne povas ne konfesi tiun planon ĝusta; li baptis sian filon Petro; mi atestas tion vera; mi trovas tiun vinon bona; ĉiuj lin titolis malsaĝulo; la poto insultas la kaldronon nigrulo.*

3. *la sola amo faris min kruela*²; *la konscienco faras nin timuloj*²; *kion vi intencas fari por vin montri inda filo de via patro?*² *la servantino, elirinte, lasis la pordon nefermita (K); ĉion Dio kreis bela siatempe*²; *almenaŭ neniun ili havu viva*²; *li pentris la diinon nuda; la naturo elmetis nin nudaj kaj mizeraj sur la bordon de tiu ĉi granda mondo*²; *li puŝis sian kubuton vunda; li kolorigis la grizan muron flava; tra ruĝa vitropeco oni vidas la blankajn objektojn ruĝaj.*

Rim. I. La objekta predikativo neniam alprenas la neŭtran finaĵon *-e*, eĉ en la okazoj, kiam ĝin ricevas la subjekta predikativo:

a) kiam la predikativo estas participo, ĝi ne povas esti adverboforma, ĉar tia participo rilatas ĉiam al la subjekto: *li pentris la sinjorinon sidanta* (= la bildo estas tiu de sidanta virino), dum: *li pentris la sinjorinon sidante* signifas, ke la pentristo mem sidis. Ambaŭ okazojn kune montras jena frazo: *la sinjorino konsterniĝis, vidante viron manĝanta herbon.*

b) kiam la predikativo estas adjektivo, kaj rilatas al infinitivo aŭ propozicio, ĝi ne povas esti adverboforma, ĉar tiam okazus, multe pli ofte ol ĉe la subjekta predikativo (§ 169, Rim. I.), konfuzo kun vera adverbo: *li opiniis ebla, ke oni maldungu la komizojn* (= por li tiu maldungo estis ebla), dum: *li opiniis eble, ke oni maldungu la komizojn* signifus, ke tiu maldungo estis eble, verŝajne lia opinio. Jen kelkaj ekzemploj: *ni trovis necesa doni la sekvantajn klarigojn*²; *mi trovas bona konigi la pruvosignojn kaj miraklojn...*²; *oni trovas ebla, kion oni deziras*²; *mi opinias konvena vigligi vin per rememorigo...*

Rim. II. Oni ne uzu infinitivon en la atribuaĵ ec-propozicioj (kiel en la ag-propozicioj, vd. § 172). Frazoj kiel: *"mi kredas lin esti bona"* aŭ *"mi kredis lin ami sian edzinon"* estas nekorektaj, kaj devus teksti: *mi opinias lin bona; mi supozis, ke li amas sian edzinon.*

Dubaj okazoj. Oni kelkfoje povas heziti inter la objekta predikativo (je nominativo) kaj la objekta epiteto (je akuzativo). Jen la ĉefaj diferencoj inter ili:

1. La objekta predikativo neniam povas esti lokita inter la objekto kaj la ĝin determinanta artikolo aŭ demonstrativo. Oni povas diri: *mi vidis la knabojn ludantaj* aŭ: *mi vidis ludantaj la knabojn*, sed ne: *mi vidis la ludantaj knabojn*; tiel lokita povus esti nur epiteto: *la ludantajn knabojn*.

2. La epiteto esprimas konstantan econ de la objekto, dum la predikativo esprimas econ, kiu antaŭe ne apartenas, almenaŭ konscie, al la objekto, sed kiu rezultas el la koncerna penso aŭ ago: *li erare pentris la virinon nigrokulan* (li pentris bildon pri la virino nigrokula, sed li eraris pri la pentro aŭ pri la pentrota persono); *li erare pentris la virinon nigrokula* (li donis al ŝi nigrajn okulojn sur la pentraĵo, dum ŝiaj propraj ne estas tiakoloraj); *mi vidas tiun domon verdan* (mi vidas domon, kiu estas kun verda koloro); *mi vidas tiun domon verda* (mi laŭ mia vidado konstatas, ke tiu domo estas verda). Speciala okazo estas la uzo de tia predikativo por montri la staton de la objekto en la momento de la predikata ago: *ili ne plu povas teni la okulojn nefermitaj^z*; *kiel infero ni englutos ilin vivaj^z*; *oni devas manĝi tiun ŝinkon varma*; *mi volas havi la ovon kuirita*; *li havas la manojn malpuraj*. Kiel oni vidas, tiu stato povas, laŭ la rimarko de Vilborg, esti postaga (plejofte), sed ankaŭ dumaga aŭ eĉ antaŭe ekzistanta.

3. El tiu naturo de la predikativo sekvas, ke en tiaj frazoj la objekton oni ĉiam supozas ekzistanta: tio gravas ĉe verboj signifantaj kreadon (produktverboj). Ili tiam modifas sian signifon, kaj la ideo de kreado aplikiga ne al la objekto mem, sed al la eco esprimita per la predikativo. Ekz-e oni povas diri, kun epiteto: *la naturo kreis unutagajn bestetojn* – tiam temas pri la kreo mem; sed oni ne povas diri: *la naturo kreis bestetojn unutagaj*, t.e. oni ne povas aserti samtempe la kreadon de la bestetoj kaj tion, ke ili kreigis kiel unutagaj. Oni devas rezigni la unuan signifon kaj diri: *la naturo kreis kelkajn (certajn) bestetojn unutagaj*, t.e. esprimi per "kreis" ne la fakton de la kreo mem, sed nur la econ de la kreitaj bestetoj, kiel la rezulton de la kreo.

Same, en la frazo: *Karlo amas la virinojn junaj* – la ideo pri amo celas ne la virinojn, sed ilian junecon; oni ne povus esprimi per tia frazo, ke Karlo amas virinojn kontraste al viroj, ekz-e: aŭ oni devus diri: *li amas virinojn, kaj li amas ilin junaj*. Frazo kiel: *Karlo amas virinojn junajn* signifus, ke la virinoj amataj de Karlo estas junaj, sed tio estus simpla konstato, kaj ne indikus, ke tiu juneco estas la rezulto de gusto pli ol de hazardo.

El tiuj ekzemploj oni vidas, ke la objekto de atribua ec-propozicio devas esti ĉiam difinita, jen per la difiniloj *la*, *tiu*, *iu*, *kelkaj*, *certa* ktp... jen per tio, ke ĝi signifas tutan specon, aŭ estas propra nomo.

4. Praktike bona rimedo de distingo estas la malvolvado de la atribua propozicio en du analizajn: se la senco postulas, ke la adjektivon aŭ substantivon anstataŭu objekta aŭ adjekta (maniera aŭ cela) subpropozicio, komenciĝanta per *ke* (ke... -as, ke... -u), tiu estas predikativo, kaj

staras en nominativo: *mi trovis la vinon bona* = *mi trovis, ke la vino estas bona*; *mi aŭdas vin sopiranta* = *mi aŭdas, ke vi sopiras*; *ili konsentis tiujn kondiĉojn tre akcepteblaj* = *ili konsentis, ke tiuj kondiĉoj estas tre akcepteblaj* (sed ne: *ili konsentis ilin!*); *vi kreis min tiel bela!*^Z = *vi kreis min tiel, ke mi estu tiel bela!*

Se la senco postulas, ke la adjektivon aŭ substantivon anstataŭu relativa subpropozicio, tiu estas epiteto, kaj staras en akuzativo: *mi trovis la bonan vinon* = *mi trovis* (inter la aliaj) *la vinon, kiu estas bona*; *ĉu vi aŭdas la muzikon dissendatan* (= kiu estas dissendata) *el Romo?*; *ili konsentis tiujn tre akcepteblajn kondiĉojn* = *ili konsentis tiujn kondiĉojn, kiuj estis tre akcepteblaj*; *vi kreis min tiel belan* = *mi, tiel bela, ŝuldas al vi mian kreigon*.

175

II. Nerekta predikativo.

La objekta predikativo povas esti, post kelkaj verboj, enkondukita per kiel. Tiu vorto ĉi tie ne estas subjunkcio enkondukanta elipsan subpropozicion (kiel ĉe la komparoj), sed simpla "liganta vorto"^Z. Efektive tian kiel-esprimon oni ne povas kompletigi je plena prop-o, ĉar per tio ĝi fariĝus komparo, dum la nerekta predikativo esprimas identigon (Vd. § 200. Rim. I). La vorton kun kiel oni do devas rigardi simpla frazelemento. Tamen, ĉar kiel ne estas prepozicio, sed liganta vorto (analoge al ol), la nerekta objekta predikativo post ĝi staras ĉiam en akuzativo, do en la sama kazo, kiel ĝia rilatato.

mi ĝin kalkulis kiel mian devon^Z; *vi rigardu lian amon kiel kapricon*^Z; *mi estimas vian deziron kiel plej sanktan leĝon* (K); *mi prenas vin ĉiujn kiel atestantojn*; *la registaroj devos iam elekti unu lingvon kiel internacian*^Z; *la naturo elkraĉu min kiel ekstermindan beston*^Z; *li prenis kiel edzinojn Jehuditon kaj Basmaton*^Z; *enskribu tiun ĉi homon kiel seninfanan*^Z; *mi starigis vin kiel observiston*^Z; *vi sanktoleos lin kiel ĉefon super mia popolo*^Z.

Tiu akuzativo estas necesa por eviti konfuzon kun la nerekta predikativo de la subjekto: ĉar en frazo kiel: *mi elektis lin kiel prezidanto*, la vorto *prezidanto* rilatas al *mi* kaj la signifo estas, ke mi elektis lin, ĉar mi estis prezidanto, pro mia prezidanta kvalito, dum en: *mi elektis lin kiel prezidanton* la vorto *prezidanton* rilatas al *li*, kaj la signifo estas, ke mi elektis lin por ke li estu prezidanto (se oni volus esprimi la nerealcon de la ago, t.e., ke mi aŭ li ne estis efektivaj prezidantoj, sed nur ŝajnaj, oni uzus kvazaŭ: *mi elektis lin kvazaŭ prezidanto* – *mi elektis lin kvazaŭ prezidanton*). Tio estas eble la kaŭzo, kial Zamenhof iafoje uzis post kiel adjektivon nominativan, ĉar ĝi ne povas krei konfuzon: *ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas ktp.... estas nur verkoj privataj, kiujn la E-istoj... povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga; mi sentas min kiel alpremita al la tero*.

Rim. I. Oni ne konfuzu la suprajn esprimojn kun la veraj subpropozicioj de komparo: tio estas inter aliaj la okazo, kiam la vorto post kiel rilatas ne al la objekto,

sed al la adjektivo aŭ adverbo: *ŝi donis al sia florejo formon rondan, kiel la suno*² (= kiel estas la suno); *li direktis sur ŝin siajn okulojn nigrajn kiel karbo (K)*; *la kalumnio portas sian langon la venenan rapide de poluso al poluso, kiel la pafado de la paflego*²; *ĉu iu alia ol mi mem povus ami tian sovaĝan beston, kiel mia edzo?*²

En tiuj okazoj oni povas ĉiam facile distingi la nerektan predikativon disde la kompara termino, per la forigo de kiel, kaj la nominativigo de la duba vorto: se la senco ne ŝanĝiĝas, tiu vorto estas ja predikativo, kaj post kiel devas do stari en akuzativo; ekz-e: *mi rigardas lin kiel amikon*, ĉar oni povas diri: *mi rigardas lin amiko*. Se la senco ŝanĝiĝas, aŭ se la frazo fariĝas absurda, tiu vorto estas kompara termino, kaj post kiel devas stari en la kazo postulita de la subkomprenita verbo. Ekz-e, oni devas diri: *li donis al la portreto rideton misteran, kiel enigmo*, ĉar oni ne povus diri: *li donis al la portreto rideton enigmo*; oni devas diri: *mi faros vian idaron kiel polvo de la tero*, ĉar se oni dirus: *mi faros vian idaron polvo de la tero*, tio signifus, ke la idaro transformiĝus en polvon, t.e. mortus.

Rim. II. Tiu rimedo de distingo ne taŭgas tamen ĉe la kondiĉa kiel (vd. § 201); tiun oni devas analizi per ĉar: *la naturo elkraĉu min kiel ekstermindan beston* (ĉar mi estas eksterminda besto). Oni do faru ankaŭ tiun ĉi provon.

Iafoje, kiel ni jam vidis, la adjektivo eĉ ne estas esprimata: *mi faros vian idaron kiel polvo de la tero*² (= multnombra, kiel); *mi faros vian ĉielon kiel fero*² (= sterila kiel).

En kelkaj okazoj la nereкта predikativo estas enkondukita, anstataŭ kiel, per por. Tio okazas precipe ĉe la predikatoj *preni* (en la senco: rigardi, taksu ion ia), *akcepti*, *servi*, *doni*: *mi prenis vin por iu pli merita*²; *mi prenis la danĝeron por ŝerco*²; *vi akceptas por kontanta mono vortojn, kiuj ne enhavas indon*²; *mi donos al vi la landon por eterna posedaĵo*²; *ŝtono servis al ni por seĝo*; *akceptu ĉi tiun bagatelon por rekompenco de viaj afablaj klopodoj*.

Rim. III. Tre malofte oni renkontas ankaŭ *prepozitivan* predikativon objektan: *li trovis ŝin laŭ sia gusto*² (laŭa al sia gusto); *ŝi opiniis lin de nobela deveno* (nobel-devena).

LA OBJEKTO

La objekto estas frazelemento esprimanta tion, al kio la ago pli-malpli rekte direktiĝas, kion la ago trafas. La objekto povas esti substantiva, infinitiva kaj povas esti esprimita ankaŭ per tuta propozicio. Ĉi lastan ni studas en la frazsintakso kiel objektan subprop-on (vd. § 233); ĉi tie ni okupiĝas nur pri la substantivaj kaj infinitivaj objektoj.

SUBSTANTIVA OBJEKTO

A. - Divido

176

Inter la substantivaj objektoj oni povas distingi du specojn:

1. la ago rekte trafas la objekton: marteli *feron*, perdi *monon*, havi *zorgon*, senti *froston*, bari *korton*, amuzi *gaston*, trinki *vinon*. Tiuj estas la *rektaj* aŭ *akuzativaj* objektoj; ili finiĝas per -n. (Kp. § 119, A.).

2. la ago ja direktiĝas al la objekto, sed ĝin trafas iel pere, ne rekte, nur concernas ĝin: paroli *pri io*, doni *al iu*, akcepti *de iu*. Tiuj estas la *nerektaj* aŭ *prepozitivaj* objektoj; ilin enkondukas prepozicioj: *pri* (malofte je), al kaj de.

La *pri*-objekto signas, ke la ago direktiĝanta al la nereкта objekto temas, traktas pri ĝi. Oni povas ĝin nomi *objekto traktativa*.

La *al*-objekto signas, ke la ago direktiĝanta al la nereкта objekto transmetas ion en ties posedon aŭ konscion. Ni nomu ĝin *objekto dativa*.

La *de*-objekto signas, ke la ago direktiĝanta al la nereкта objekto apartigas ion de tiu, aŭ de ties posedo aŭ konscio. Ni nomi ĝin *objekto ablativa*.

Rim. I. Ne estas ĉiam facile distingi inter nereкта objekto kaj adjekto. Unuflanke, la prepozitivan komplementon de kelkaj verboj, kiuj ne toleras rektan objekton (kaj do ŝajnas vere netransitivaj), oni emus rigardi adjekto; ekz-e, ĉar oni ne diras *ĝoji*, *silenti ion*, la prepozitivaj en la esprimoj: *ĝoji pri io*, *silenti pri io* povas esti nomataj concern-adjektoj. Sed la analogio inter *ĝoji pri io* kaj *ridi pri io*, *silenti pri io* kaj *sekreti pri io* ktp. pledas por klasado inter la nerektaj objektoj, ĉar oni povas egale diri *ridi pri io* kaj *ridi ion* ktp. Aliflanke, kelkaj verboj toleras post si indiferece jen rektan objekton, jen komplementon enkondukitan per drastsignifaj prepozicioj: ĉi lastan oni do emus rigardi nereкта objekto: ekz-e, oni diras *fuĝi*, *atingi*, *embuski*, *insidi*, *koleri*, *kontrasti*, *simpatii iun*; *partopreni ion*, do en *fuĝi antaŭ iu*; *atingi ĝis io*; *embuski*, *insidi*, *koleri kontraŭ iu*; *kontrasti*, *simpatii kun iu*; *partopreni en io* oni rajtus nomi la prepozitivajn nerektaj objektoj. Sed la forta signifo de la prepozicioj, kaj la analogio inter *fuĝi antaŭ iu* kaj *fali antaŭ iu*, *atingi ĝis io* kaj *kuri ĝis io* ktp. pledas por klasado inter la adjektoj.

Pro pure praktikaj motivoj, ni principe pritraktos la prepozitivajn enkondukitajn per *pri*, *al*, *de* (kiam ili signas tion, kion la ago concernas) inter la nerektaj objektoj, kaj ĉiujn aliajn inter la adjektoj (vd. § 210).

Rim. II. Tiujn du egalvalorajn esprimilojn (la akuzativon kaj la prepoziciojn) oni neniam uzas samtempe por montri la objekton, kiel tion oni faras kelkfoje ĉe la adjektoj (vd. §§ 191-192). Ŝajna kontraŭdiro ekzistas post la prepozicioj *ĉirkaŭ*, *ĝis*, *po* antaŭ objektoj akuzativaj; ties klarigon vd. en la § 87. A.

B. - Elektro

177

La elekto inter la diversaj specoj de objektoj dependas parte de la esprimota ideo, sed parte ankaŭ de la signifoj kaj de la konstruktimoj de la uzata verbo. Certe, la elektopovo, en nia logika kaj ankoraŭ juna lingvo, estas senkompare pli granda, ol en la naciaj lingvoj, sed tamen ĝi ne estas tiel absoluta kaj dependa nur de la logiko, kiel ĉe la adjektoj.

La uzado, bazita sur nacilingva kutimo aŭ sur neklarigebla sencokonveno, trudiĝis por kelkaj verboj nevarian konstruon de la objekto: oni ne diras *fari al io* aŭ *aparteni iun sed fari ion* aŭ *aparteni al iu*. Ni devas do unue esplori kaj klasi la verbojn laŭ tiu vidpunkto.

Ĉi-koncerne oni povas dividi la verbojn jene:

1. Ekzistas verboj, ĉe kiuj oni trovas ĉiam la saman specon de objekto aŭ objektoj, ĉe kiuj do la speco de la objekto estas *deviga*. Tiujn verbojn oni povas nomi *fiks-objektaj verboj* kaj la koncernajn objektojn *objektobjektoj*. Sed ankaŭ la fiksojektajn verbojn oni povas subdividi laŭ la ebla nombro de iliaj objektoj:

a) unuj el ili trafas nur unu objekton samtempe, jen rektan (tio estas la plej ofta okazo), jen nerektan. Ĉi tiujn, ĉar ili efikas nur en unu direkto, oni povas nomi *unudirektaj verboj*; ekz-e *ami* (iun); *aparteni* (al iu);

b) aliaj povas trafi samtempe du objektojn, el kiuj ĝenerale unu estas nomo de persono, kaj la alia, nomo de afero. Ĉar ili do efikas samtempe en du direktoj, oni povas ilin nomi *dudirektaj verboj*; ekz-e: *doni ion al iu*; *savi iun de io*. Kiel oni vidas, el la du objektoj unu staras en akuzativo kaj la alia en prepozitivo, ĉar ne estas eble en Esp-o, ke ili staru ambaŭ en akuzativo, kiel ekz-e en la latina. Alidire: unu Esp-a verbo ne povas havi samtempe du rektajn objektojn.

2. Ekzistas verboj, ĉe kiuj oni trovas diversajn specojn de objektoj, sed ĉe kiuj la variado de la objektspeco tute ne ŝanĝas la sencon. Tiujn verbojn, ĉe kiuj do la speco de la objektoj libere alternas, oni povas nomi *alternobjektaj verboj* kaj la koncernajn objektojn *objektobjektajn*. Ankaŭ tiujn verbojn oni povas subdividi laŭ la objektnombro:

a) ĉe unuj oni trovas samtempe nur unu objekton, do ili estas *unudirektaj*. La objekto estas jen rekta, jen nereкта, sen eĉ nuanca diferenco: ekz-e *obei iun kaj al iu*; *rememori iun kaj pri iu*. Ĉe tiaj verboj do la prepozicio havas nenian alian signifon ol la akuzativa -n, kaj ĝi estas nur malplena gramatikilo; sekve, oni povas indiferece transformi la rektan objekton en nerektan kaj reciproke.

b) ĉe aliaj oni povas trovi samtempe du objektojn, do ili estas *dudirektaj*. Sed oni povas indiferece uzi kiel rektan objekton jen la personan, jen la aferan nomon; la sola ŝanĝo estas, ke la nereкта objekto ne konstruiĝas kun la sama prepozicio en la du okazoj. Ekz-e, oni povas diri, sen eĉ nuanca diferenco de senco: *instrui iun pri io kaj ion al iu*; *peti ion de iu kaj iun pri io* ktp.

Rim. Ni vidis en la § 119. A, ke la transitivaj verboj povas esti uzataj ankaŭ *absolute*, t.e. sen rekta objekto; tiam ni povas paroli pri objekto *latenta*. La dudirektaj verboj, siavice, povas esti uzataj *nekomplete*, t.e. kun nur unu objekto; la alia objekto ne estas esprimita, ĉar ĝi estas evidenta el la kunteksto: *mi skribis al li* (leteron); *li instruas la lingvon francan* (al siaj disĉiploj). Tiaj verboj do povas havi *manifestan* (esprimitan) kaj *latentan* (neesprimitan) objekton.

Ekzistas ankaŭ objektoj *okazaj*, kiuj, se ili mankas, ne devas esti subkomprenataj,

ĉar ili aldonas ion kroman, ne postulatan de la senco de la verbo. Ekz-e en: *mi diras ion pri iu*, la objekto *pri iu* estas okaza objekto, ĉar oni ne devas nepre diri ion pri *persono*. Kun tiaj okazaj objektoj kelkaj verboj povas havi ankaŭ tri objektojn samtempe, do ekzistas ankaŭ *tridirektaj* verboj: *mi diras ion al iu pri iu*.

3. Ekzistas verboj, ĉe kiuj oni trovas diversajn specojn de objektoj, sed ĉe kiuj la variado de la objektospeco pli-malpli ŝanĝas la senco: la senco do estas strikte ligita al la respektiva objekt-speco. Ni nomu ilin *diversobjektaj verboj* kaj la objektojn mem *objektoj diversaj*. Ekz-e: *kredi ion* (rigardi ion vera) kaj *kredi je (pri) iu* (kredi vera la ekziston de iu). Kiel oni vidas, tie ĉi temas pri du fiksitaj objektoj de la sama verbo kiel ĉe la fiksojektaj dudirektaj verboj. La diferenco estas, ke la diversaj objektoj aŭ ne povas esti uzataj samtempe, aŭ, se ili estas tiel uzataj, la nereкта objekto perdas sian specialan senco; ekz-e, en: *kredi ion pri iu* jam ne temas plu pri la ekzisto de tiu iu.

REKTA OBJEKTO

178

Rektan aŭ akuzativan objekton oni trovas post la transitivaj verboj (vd. § 119. A). Ne estas necese citi tiujn verbojn; oni rigardu la Plenan Ilustritan Vortaron pri la transitiveco aŭ netransitiveco de certa verbo.

Pri la objekto oni demandas per kion, kiun; per tia demando oni povas elserĉi la rektan objekton el frazo. Ekz-e: *oni batis la knabon*. – *Kiun? La knabon*. Do *knabon* estas la rekta objekto.

Kiuj ne havas devigan akuzativon en sia lingvo, tiuj povas, en okazo de dubo, orientiĝi pri la rekta objekto per tio, se la koncernan frazelementon ili anstataŭigas per la vira personpronomo, kiu havas en ĉiu lingvo apartan akuzativan formon. Ekz-e: *oni batis la knabon* – *oni batis lin*; se la pronomo estas akuzativa ankaŭ la substantivo devas esti tia.

Rim. I. *Estas* (= ekzistas) postulas ne rektan objekton (kiel *F, il y a; G es gibt*), sed subjekton, do nominativon: *estas aferoj, kiuj...* Same: *restas, ŝajnas, mankas, aperas*. Latinidlingvanoj ofte eraras pri tio, precipe ĉe postmetita subjekto kaj uzas erare akuzativon: *ŝajnas eraron, ke...* ("sisterona akuzativo" tion nomis R. Schwartz laŭ tiu-urbeta gazeteto, en kiu svarmis tiaj eraroj).

Rim. II. La rekta objekto staras ĉiam en akuzativo, krom se ĝi estas:

a) pronome uzata numeralo: *el la kvar pomoj, unu mi manĝis kaj tri mi kunportis; unu el viaj fratroj lasu ĉe mi*^Z. Tiaokaze oni metu la numeralon ĉiam antaŭ la subjekton aŭ post la predikaton, ne inter tiujn du.

b) kvanta adverbo: *oni aŭdas multe da birdoj* (multajn birdojn); *donu al mi iom da kafo* (malmultan kafon); *diri kelke da vortoj*^Z (kelkajn vortojn).

Kiam la rekta objekto estas enkondukita per la kvanta esprimo **pli ol unu**, oni rajtas uzi la nominativon: *oni estus evitinta pli ol unu miskompreno*, skribis Grosjean-Maupin, ĉar la analizo ja estas: *pli multajn miskomprenojn ol unu miskompreno* (vd. § 33, B. 1.). Tamen, en tiaj okazoj Z. uzas la akuzativon: *mi povus nutri pli ol unu familion*, verŝajne pro la analogio de: *pli ol du homojn*; la akuzativigo estas cetere pli konsilinda, ĉar en kelkaj okazoj ĝi helpas forigi miskomprenon: *unu ĉevalo helpas pli, ol unu homo* (donas pli grandan helpon, ol unu homo);

unu ĉevalo helpas pli ol unu homon (ne nur unu homon).

c) citaĵo: *sinjorinoj aĉetas Bismark kun floraĵoj^z* (ŝtufon nomatan Bismark); *mi sendas al vi 20 vortarojn, 5 "Gefratoj" kaj 5 "Neĝa Blovado"^z* (5 librojn tiele nomatajn); la *"Gazette de Lausanne"* mi ricevis^z. Kp. § 132, II, Rim. II.

d) aparta okazo estas la kunmetitaj adjektivoj (Kp. § 68c): ĉe ili Zamenhof, konforme al sia konstanta opinio, ke oni uzu akuzativon nur en okazo de klara neceso, akuzativigas nur la duan: *mi ricevis vian vortareton "hebrea-internacian"*; *vortaron Esperanta-rusan*. G. W.

En tiaj turnoj estas rekomendinde, se estas inversigo, meti la subjekton tuj post la objekto; se ne, la frazo riskas esti ne klara: *multe da infanoj deziris al ili la benanta pastro* estas malbona frazo, ĉar nur la du lastaj vortoj difinas ĝian sencon. Cetere, en okazo de konfuzo, oni turnu sian frazon alimaniere.

Rim. III. La transitiva uzebleco de la verboj estas en E-o pli larĝa ol en la naciaj lingvoj ĝenerale: oni povas diri, ke ĉiu verbo povas esti uzata transitive, se la tiel formita esprimo povas havi sencon. Tio devenas el la 14a regulo, ke ĉiu prepozicio estas anstataŭigebla per la akuzativa kazo. Escepto estas nur la prepozicioj demovaj (de, el): ilian anstataŭigon malhelpas la alnova subsenco de la akuzativo; (vd. § 373, Rim. IV.). Tiel ekzemple, la verboj *sidi, iri, kuŝi* povas havi rektan objekton: *sidi seĝon, kuŝi liton, iri vojon*, kvankam ordinare oni uzas post ili prepozicion; same en siaj komencaj verkoj Z. skribis: *ŝi ofte sonĝas mortintojn; mi miras la saĝecon de tiu homo; la nuna grandeco de la vortoj povas resti en la lingvo kaj neniu sentos la bezonon ĝin plendi*. Poste li preferis uzis la taŭĝan prepozicion, sed tian liberan uzadon de la akuzativo reimitis la nunaj poetoj. Male oni neniam legas ekz-e "*eliri urbon*", ĉar tio povas ankaŭ signifi "*eliri kaj direkti sin al urbo*". Cetere oni ne povas uzi verbon transitive, se per tio oni ŝanĝus ĝian signifon: oni ne povas diri *bruli lignon*, ĉar bruli ne povas havi la sencon de *bruligi*. Tion precize klarigis Grabowski: "Laŭ klarigo de la Majstro, la opinio, ke en Esp-o ĉiu verbo povas havi sencon aktivan kaj pasivan, ne estas ĝusta. La fakto estas, ke ĉiu verbo povas havi post si rektan komplementon, sed ne ŝanĝante la sencon de la verbo" ("Oficiala Gazeto", 1910).

Esence netransitivaj oni sentas la *iĝi*-verbojn; ĉe ili oni evitas eĉ la akuzativon anstataŭ prepozicio; oni do ne diras: *kutimiĝi ion* (sed: *al io*), *sciigi ion* (sed: *pri io*), kvankam oni povas diri: *ekkutimi ion, ekscii ion*. Esceptoj estas renkontataj malofte ĉe Z. por doni poezian koloron al la frazo: *tiu gravediĝis malbonon kaj naskis mensogon*.

Aliflanke, la transitivaj verboj povas esti uzataj nur transitive (*komenci, fini, turni, ŝanĝi* ktp.) kaj ilian netransitivan formon oni faras per *-iĝi* (*komenciĝi, finiĝi* ktp.). Kompreneble la rekta objekto povas esti nur subkomprenata: *ni komencu; kial vi ne skribas?*

La transitivaj verboj povas esti fiksojektaj, alternobjektaj kaj diversobjektaj.

El la fiksojektaj verboj, multaj estas unudirektaj, do ili povas havi nur unu (akuzativan) objekton: *ami, marteli, havi, amuzi, manĝi, trinki, bari, kovri, fosi, nutri, ŝtopi* ktp. (*ion* aŭ *iun*). La aliajn specojn de verboj, ĉe kiuj la rekta objekto kombiniĝas aŭ alternas kun nereкта, ni studos en la sekvanta paragrafo, ĉe la nerektaj objektoj.

La tri nerektajn objektojn ni pritraktos en tri partoj. Unue ni studos tiujn okazojn, kiam ili estas objektoj fiksjaj, poste ni studos ilin ĉe al-ternobjektaj kaj fine ĉe diversobjektaj verboj.

A. – Fiksaj objektoj

1. **T r a k t a t i v a o b j e k t o (pri-objekto).** La traktativa objekto estas la *objekto de la temeco*. Oni do uzas ĝin, kiam la ago ne trafas la objekton en ties pleneco, sed nur rilatas al ĝi, koncernas ĝin, temas pri ĝi. Oni trovas ĝin:

a) ĉe unudirektaj verboj *ĝoji, silenti, mediti, certi, pravi, kontenti pri io*. Ni vidis (§ 176, Rim. I.), ke tiujn objektojn pli ĝuste estus nomi adjektoj.

b) ĉe dudirektaj verboj, en kombino

aa) kun rekta objekto. Tiaokaze la rekta objekto montras tion, kion la ago trafas rekte, kaj la pri-objekto montras la temon de la ago. La rekta objekto devas esti: persono ĉe unuj verboj: *akuzi, atentigi, averti, informi iun pri io*; kaj afero ĉe aliaj: *rakonti, skribi, diri, pentri ion pri io*.

Rim. I. La verbojn sub aa) oni ankoraŭ povas dividi en tri grupojn: 1. la verboj kun persona rekta objekto estas absolute fiksojektaj, t.e. ĉiu el ili konservas sian formon, ankaŭ kiam la alia latentigas: *averti iun kaj averti pri io*; 2. el la verboj kun afera rekta objekto, unuj (*diri, pentri* k.s.) estas same absolute fiksojektaj, sed el la du objektoj nur la pri-objekto povas latentigi: oni ne diras: *diri pri io*, nek *pentri pri io*, sed oni devas ĉiam meti ankaŭ la rektan objekton: *diri ion pri io, pentri bildon pri io*; 3. aliaj verboj kun afera rekta objekto (*rakonti, skribi* k.s.) estas fiksojektaj nur, kiam ili estas esprimataj komplete; ĉe nekompleta esprimiĝo nur la persona pri-objekto estas fiksa: *rakonti, skribi pri io*; la afera objekto, se ĝi staras sola, povas esti esprimita jen rekte, jen nerekte, kun iom da nuancdiferenco: *rakonti, skribi ion kaj pri io*; tiujn oni povas nomi relative fiksojektaj verboj.

bb) kun al-objekto; tian kombiniĝon oni trovas:

ĉe kelkaj netransitivaj pri-objektaj verboj: *paroli, fanfaroni al io pri io*; ambaŭ objektoj povas latentigi, la manifesta objekto ĉiam konservas sian fiksan formon,

el la dudirektaj verboj, ĉe la verboj kun afera rekta objekto. Tiam do oni povas trovi eĉ tri objektojn: *rakonti al io ion pri io*. La al-objekto ĉiam povas latentigi; pri la latentigo de la aliaj du objektoj validas tio, kion ni diris en la antaŭa Rim.: do ili kondutas, kvazaŭ la al-objekto ne ĉeestus.

Rim. II. Ĉe kelkaj dudirektaj fiksojektaj verboj, ĉe kiuj la rekta objekto ne povas latentigi, oni tamen povas elasi ĝin kaj sentigi per la prefiksoido *pri*, dum la pri-objekton oni metas en akuzativon: *priskribi iun*. La samon oni povas fari ĉe kelkaj netransitivaj verboj: *preparoli ion*. Sed la senco ne estas tute la sama. (vd. § 390, Rim. II).

Rim. III. La prepozicio *pri* estas interesa pro tio, ke ĝi estas uzata ekskluzive abstrakte, signante la objekton, kiun la ago koncernas. En multaj naciaj lingvoj

mankas tia prepozicio (en ili oni helpas sin per metafore uzataj lokaj prepozicioj). Tio eble estas la kaŭzo, kial en la unuaj jaroj de nia lingvo oni iom hezitis pri la uzo de **pri**, kaj kelkfoje anstataŭigis ĝin per **je**. Kun la sekvantaj verboj eĉ persistis tia konstruo: *sufери je ftizo* (aŭ: *ftizon*); *veti je granda sumo*; *malsani je la koro*, *je lepro*; *soifi je kiso*; *gravediĝi je filo*; *kalkuli je iu*; *kredi je iu*, *je io* (kredi je la ekzisto de iu aŭ io: *li kredas je la fantomoj*) (vd. ankaŭ sub C. en ĉi tiu §). Sed oni diras ankaŭ *kredi pri* apud *kredi je*. Aliajn signojn de tiu hezito vd. ĉe la koncern-adjektoj (§ 210)

2. **D a t i v a o b j e k t o (al-objekto)**. Ĝi estas la objekto de la *ricev-anteco*. Oni trovas ĝin:

a) ĉe kelkaj unudirektaj verboj: *aparteni*, *deci*, *konveni*, *manki*, *plaĉi*, *utili al iu (io)*. Akuzativa objekto ĉe ili estas teorie uzebla, sed praktike ne uzata; ĝin oni trovas nur kelkfoje en la poezia lingvo (*tio min apartenas*; *ŝi lin plaĉis*; *tio decas lin*, *mankas lin*);

b) ĉe dudirektaj kaj tridirektaj verboj (vd. supre Rim. I.): *adicii*, *atribui*, *adresi*, *diri*, *doni*, *donaci*, *cedi*, *deziri*, *flustri*, *imputi*, *indiki*, *inspiri*, *havigi*, *konfesi*, *konsili*, *kutimigi*, *liveri*, *montri*, *miksi*, *ordoni*, *preferi*, *permesi*, *prediki*, *prezenti*, *promesi*, *proponi*, *prunti*, *rabi*, *reciproki*, *respondi*, *sendi*, *skribi*, *ŝteli*, *ŝuldi*, *trudi* (ion al iu); *kondamni iun* (al io). El la supraj verboj, ĉe *cedi*, *donaci*, *flustri*, *konfesi*, *konsili*, *ordoni*, *prediki*, *prunti*, *respondi*, *skribi*, ambaŭ objektoj povas latentigi, la nesprimita povas esti subkomprenata. Ĉe la aliaj verboj, nur la al-objekto povas latentigi: oni ekz-e ne diras: *diri al iu*, sed ĉiam metas la rektan objekton, aŭ en formo de akuzativa substantivo, aŭ en formo de subprop-o aŭ de citata frazo.

3. **A b l a t i v a o b j e k t o (de-objekto)**. Ĝi estas la objekto de la *apartigiteco*. Oni trovas ĝin:

a) ĉe la unudirektaj netransitivaj verboj: *apartiĝi*, *diferenci*, *disiĝi*, *distingiĝi*, *kaŝiĝi*, *liberiĝi*, *saviĝi*, *seniĝi* de io. Tiun objekton, tamen, pli ĝuste estas rigardi ablativa adjekto. Oni uzas ankaŭ je kaj aliajn prepoziciojn anstataŭ de (vd. § 212).

b) ĉe la dudirektaj verboj: *aĉeti*, *akcepti*, *apartiĝi*, *deteni*, *diferencigi*, *disigi*, *distingi*, *gardi*, *kaŝi*, *liberigi*, *preni*, *rabi*, *savi*, *senigi*, *ŝirmi*, *ŝteli ion (iun)* de io (de iu).

Ĉi tiu ablativa objekto distingiĝas per tio, ke ĝi havas la plej ĉirkaŭlimitan sencon el la tri nerektaj objektoj, pro la du kontrastaj signifoj, kiujn ĝi entenas: ĝi ja signas almovon pri la ago, sed demovon pri la rekta objekto, pere de la ago. Ekzemple, en *ŝi akceptis de li la donacon* – la akcepto trafas *lin* same kiel la donacon, sed la donacon demovas de *li*. El tio sekvas, ke de-objekto, ĉe transitivaj verboj, ne povas esti uzata sola, sed nur kune kun alia (demovata) objekto. Ĉe la netransitivaj verboj (ekz-e: *li disiĝis de ŝi*) ĝi povas stari sola, ĉar tiam la *subjekto* esta demovata.

Rim. IV. En *timi de*, *sufери de*, *morti de* oni havas ne ablativ-objektan, sed kaŭz-adjektan de (vd. § 208). En *dependi de* temas pri metafore uzata demova lokadjekto.

Rim. V. Tio, ke de povas esti ag-adjekta (post pasiva verbo: *li estas trompita de sia amiko*) kaj ankaŭ ablativ-objekta, kelkfoje povas naski konfuzon. Ekzemple: *ili estas distingitaj de ni* estas dusenca: 1. *ni distingis ilin*; 2. *oni distingis ilin de ni*. Por tion eviti, oni uzis diversajn rimedojn: **Z.** uzas al-objekton post *preni, rabi, ŝteli* (*la horloĝo estis ŝtelita al mi*). Post *heredi* li uzas post: *domo kaj have estis heredataj post gepatroj*. Post *aĉeti* li uzas la formon de-el: *aĉetitaj de Abrahamo de-el la filoj de Het*. Post *gardi, kaŝi, savi, ŝirmi* oni povas uzi kontraŭ, post *senigi, apartigi* la prepozicion je.

Plej oportune estus uzi, en tiaj okazoj de neceso, unuece la formon **disde**: *preni, rabi, savi, distingigi, aĉeti, apartigi, senigi disde*.

B. — Alternaj objektoj

Alternajn objektojn oni trovas:

a) ĉe unudirektaj verboj: ĉe ili rekta objekto povas varii kun nereakta, *aa)* **pri**-objekton aŭ akuzativon oni uzas sen senc-diferenco, preskaŭ laŭplaĉe, ĉe la sekvantaj verboj: *ambicii, apelacii, aspiri, atenti, dubi, esperi, forgesi, funebri, honti, indulgi, juĝi, konscii, konsenti, kontrakti, krii, kulpi, memori, miri, raportii, reklami, revii, rezigni, sopiri, zorgi ion* (iun) aŭ *pri io* (iu).

bb) jen al-objekton, jen akuzativon oni trovas preskaŭ sen senc-diferenco ĉe la verboj: *adiaŭi, aklami, aludi, antipatii, aspiri, celi, danki, favori, fidi, flati, gapi, gardi, helpi, imponi, indulgi, influi, komandi, kompati, komplezi, kondolenci, konfidi, kontrasti, minaci, naŭzi, obei, opozicii, respondi, rigardi, servi, simili, simpatii, sopiri ion* (iun) aŭ *al io* (io).

b) ĉe kelkaj dudirektaj verboj, kie nerektaj objektoj, kelkfoje adjektoj, varias inter si en kombino kun rekta objekto, sen nuanc-diferenco: *envii, instrui, komisi, konfidi, pardoni, persvadi, sciiĝi iun pri io aŭ ion al io; demandi, peti iun pri io aŭ ion de io; pagi ion al io kaj iun per io*.

C. — Diversaj objektoj

Ili, kiel ni diris (§ 177, B. 3.) havas diversajn objektojn kun diversa senco.

Inter la diversobjektaj verboj oni povas mencii ankaŭ tiujn, kiuj povas havi memstaran pri-objekton kaj objekton rektan: *skribi ion* (leteron ktp) kaj *skribi pri io* (temo). Sed ĉar tiuj du objektoj diverssencaj povas kombiniĝi, ni studis tiujn verbojn inter la fiksojektaj dudirektaj verboj (vd. supre sub A).

Male, vera diversobjekta verbo estas *scii*, ĉar *scii ion* signifas: posedi ion mense, dum *scii pri io*: scii, ke io ekzistas.

Aliaj diversobjektaj verboj estas, ekz-e:

kalkuli ion (difini ies nombron); *kalkuli je (pri) io* (esperii ion, kiel necesan por realigo de projekto); *kalkuli je (pri) iu* (fidi, ke li helpos); *kalkuli kun* (ne lasi sen konsidero); *oni devas kalkuli kun la kutimo²*; *kredi ion* (rigardi ĝin vera); *kredi je (pri) iu aŭ io* (kredi ies ekziston);

kredi ion povas kombiniĝi kun al-objekto: *kredi al iu* (rigardi iun verdirema); *kredi al iu ion* (rigardi vera tion, kion iu diras); *kapti ion* (ekteni); *kapti al (pri) io* (fari la movon de mankapto, sed mistrafi); *signi ion* (montri, evidentigi, manifesti); *signi al iu* (gesti per mansigno); *timi iun* (timigan, timindan); *timi pri iu* (timi, ke li estas en danĝero); *voki iun al io* (peti, inviti, ke li venu); *voki al iu^z* (krii, precipe por helpo); *venĝi iun* (puni ies ofendinton); *venĝi ion al iu* (puni pro io iun venĝe).
 Rim. VI. *Venĝi iun* ne malofte estas uzata en ambaŭ sencoĵ, tio estas evitinda. Oni povus uzi ankaŭ *privenĝi iun* kaj *venĝi kontraŭ iu pro io*.

INFINITIVA OBJEKTO

Ĉe pluraj verboj la objekto povas alpreni infinitivan formon anstataŭ substantiva. La infinitivo, kiel ni vidis, estas transira formo inter verbo kaj substantivo, kaj, kiel objekto, ĝi havas substantivan funkcion. Sed de la substantivo ĝi diferencas en du punktoj:

a) Ĝi povas alpreni neniun objekt-distingilon: nek la akuzativan *n*, nek la tri prepoziciojn. Ĝi do havas solan nevarian formon kaj nur la struktura analizo malkaŝas, ĉu ĝi rolas kiel rekta aŭ kiel nereкта objekto. Ekz-e en: *mi permesas al vi foriri*, la infinitivo estas rekta objekto (mi permesas foriron), dum en: *mi instruas lin legi*, ĝi estas traktativa (mi instruas lin pri legado).

b) Ĝi funkcias rilate al siaj suplementoj kiel vera verbo, do ankaŭ ĝi mem povas havi objekton akuzativan; ekz-e: *mi deziras legi libron*. En tiu ĉi prop-o *deziras* ŝajnas havi du rektajn objektojn: unu infinitivan (legi) kaj unu substantivan (libron). Tamen, *libron* estas ne la objekto de *deziras*, sed la objekto de *legi*, ĉar, se oni metas verbo-substantivon anstataŭ la infinitivo, *libron* iĝas ties objekta suplemento: *mi deziras la legadon de libro*. El tio sekvas, ke la ebleco de tia substantiva objekto dependas ne de la transitiveco de la predikato, sed de tiu de la infinitiva verbo; ekz-e: *mi deziras sidiĝi* ne povas havi kroman akuzativan objekton.

Rim. Oni ne konfuzu kun tiuj infinitivaj objektoj la infinitivajn subjektojn! Vd. § 154, Rim. I.

Ni dividos la infinitivajn objektojn en du partojn: unue ni studos tiujn verbojn, ĉe kiuj la infinitivo funkcias kiel rekta objekto; poste tiujn, ĉe kiuj ĝi havas la funkcion de objekto nereкта.

Rekta objekto

Infinitivon kiel rektan objekton oni trovas:

1. Ĉe tri ekskluzive infinitiv-objektaj verboj: *devi*, *povi* kaj *voli*. Fakte, oni diras: *vi devas obei*, kaj neniam: *vi devas obeadon*. Pri substantiva

objekto de *voli* vd. § 116, *d. a.*

Rim. I. Ni vidis (§ 96, Rim. I.), ke tiujn tri verbojn pli ĝuste estas rigardi modaj helpverboj, formantaj kun la infinitivo kompleksan verboformon.

2. Ĉe verboj, kiuj povas havi alterne infinitivan aŭ substantivan objekton: *ami, bezoni, celi, decidi, deziri, emi, esperi, eviti, fini, forgesi, honti, imagi, intenci, komenci, konsenti, kuragi, kutimi, lerni, pensi, preferi, projekti, provi, revii, rifuzi, riski, scii, sukcesi, ŝati, timi* (-i). Kiel ni vidis supre, se la infinitiv-objekta verbo estas transitiva, ĝi povas havi mem rektan objekton substantivan: *mi rifuzas fari tion* (mi rifuzas la faradon de tio) kaj eĉ infinitivan: *mi deziras lerni naĝi* (mi deziras la lernadon de naĝado). La subjekto de la predikata kaj infinitiva agoj estas ĉiam identa.

Rim. II. Laŭ la komenca uzado de Z. la verbo *daŭrigi* devus klasiĝi ĉi tie; sed poste Z. kondamnis tiun dirmanieron, argumentante, ke *daŭri* signifas "esti plue", kaj ke: *mi daŭrigas labori* signifus do "mi igas esti plue labori", kio estas absurda. Li konsilas do diri aŭ *mi daŭrigas mian laboron*, aŭ: *mi laboras plue*. Ni konstatas, en tiu okazo, unu el la maloportunaĵoj de la kunmetitaj vortoj, kiun ni signas § 418, B.: se la ideo pri "daŭrigi" estus esprimita en Esp-o per primitiva vorto, neniu dubo, ke oni uzus post ĝi egale infinitivon aŭ akuzativan substantivon, laŭ la ekzemplo de multaj naciaj lingvoj. Sed la spirito malkomponas la kunmeton, kaj neobligas tiel la tamen oportunan uzon de la infinitivo. Cetero oni lastatempe rekomencas uzi *daŭrigi labori*. Vd. ankaŭ § 182, Rim. I.

3. Ĉe dudirektaj verboj, kiuj havas ankaŭ kroman al-objekton: *arogi, doni, helpi, komisi, komplezi, konsili, malpermesi, ordoni, permesi, promesi, proponi, rekomendi, trudi* (al iu -i); *doni manĝi kaj trinki al iu*^z; *vi arogas al vi esperi, ke...*^z

Rim. III. El la supraj verboj, ĉe *arogi, komplezi, promesi*, la subjekto de la ĉef-predikato kaj de la infinitivo estas la sama, ekz-e en: *li promesis veni*, la promesanto estas la venanto. Ĉe la aliaj verboj, male, la du subjektoj ne estas la samaj: la subjekto de la infinitivo estas la al-objekto; ekz-e en: *li permesis al ŝi foriri*, la foriranto estas ŝi. Ĉe *proponi* ambaŭ okazoj estas eblaj: *mi proponis fari la taskon mem*; *mi proponis al ili dividi la laboron*.

Ankaŭ la verboj de sciigado (*skribi, diri, telefoni* ktp.) estas uzataj malofte kun infinitivo kaj al-objekto, sed nur, kiam ili subkomprenigas ordonon aŭ inviton: *la reĝo skribis al la guberniestro veni tuj*; la subjekto de la infinitiva ago estas ĉiam la al-objekto. En tiaj okazoj oni ne povas analizi la infinitivon per substantivo (skribis al li venon), ĉar tio ne montrus la ordonon; la sola anstataŭaĵo estas subprop-o kun volitivo (ke li venu).

4. Ĉe la diversobjekta verbo *peti*, en kombino kun de-objekto: *li petis de ŝi trinki*^z (trinkon); la subjekto de la infinitiva ago estas la predikata subjekto (li petis, ke li trinku). Male, en: *li petis ŝin trinki* (pri trinko) la du subjektoj ne estas identaj (*li petis, ke ŝi trinku*). Kp. § 182, 2.

Nerekta objekto

182

Kiel ni vidis, tion, ke infinitivo funkcias kiel nerekta objekto, malkaŝas nur la analizo, t.e. la transformo de la infinitivo en verbo-substantivon. Nome, tiam la verbo-substantivo alprenas ne-rektobjektan prepozicion. Ekzemple, *instrui iun skribi* estas transformebla al *instrui iun pri skribado*. La nerekta infinitiva objekto estas ĉiam traktativa objekto. Oni trovas ĝin:

1. Ĉe kelkaj malmultaj netransitivaj verboj. Plej kutima estas tia uzado ĉe *ĝoji, furi, heziti, klopodi, peni, rajti, rapidi*; ekz-e: *mi ĝojas vin vidi; li hezitis ekparoli; ni furis batali²; rajti, klopodi, rapidi ion fari*. Malpli ofte oni trovas ĝin ankaŭ ĉe kelkaj aliaj verboj, kiel montras la ekzemploj: *ne fieru havi tian kutimon; li indignis esti nomata kamarado; mi miras revidi vin tiel frue*. La subjekto de la ĉefpredikato kaj de la infinitivo estas ĉiam la sama.

Rim. I. Tie ĉi klasiĝas ankaŭ la iom stranga uzado de infinitivo post *ĉesi*; ekz-e: *ĉesu min honori per tia titolo²*. Nome, se oni transformas la infinitivon en verbo-substantivon, oni devas diri: *ĉesigu mian honoradon*; ekzistas do malsimetrio, kiu ne ekzistus, se oni dirus: *ĉesigu min honori* (tiam la infinitivo estus simpla rekta objekto). Sed ankaŭ tie ĉi, kiel ĉe *daŭrigi* (vd. § 181, Rim. II.), la analizo de la kunmeto neebbligas tian esprimmanieron. La uzadon de infinitivo post *ĉesi Z.* pravigas per misrezonado: li argumentis, ke *ĉesi* signifas: "ne plu esti, ne plu -i", kaj sekve oni povas egale diri: *la pluvo ĉesas* (= ne plu estas), kaj: *mi ĉesas labori* (= mi ne plu laboras). Oni vidas, ke la subtilaĵo konsistas en la anstataŭigo de "esti" per "-i" en la difino: se li estus same argumentinta pri *daŭri* (kiu egalus aŭ "esti plue" aŭ "-i plue"), li estus praviginta ankaŭ la uzadon de "mi daŭras labori". Sed fakte, li volis nur doni pli-malpli bonan pravigon de jam enradikiĝinta uzado. Ĉiel, la rezulto estas, ke tiuj du analogaj verboj, *daŭri* kaj *ĉesi*, ricevis tute diverĝajn destinojn. Same okazis pri la paro *antaŭ* kaj *post* (*antaŭ foriro, antaŭ ol foriri, antaŭ ol li foriris*, sed: *post foriro, foririnte, post kiam li foriris*). Aliajn malsimetriojn, truditajn de la uzado, vidu §§ 66, 113, 413, kaj komenton paĝo 8 (antaŭlasta alineo).

Cetere, oni povas pravigi tiun uzon per tio, ke *mi ĉesas labori* signifas: *mi ĉesas koncerne la laboradon, el la vidpunkto de la laborado*. Sed same oni povus pravigi ankaŭ: *mi daŭras labori*, do la malsimetrio ankaŭ ĉi tiu rezonado ne ĉesigas. Anstataŭ *li daŭris labori* oni kelkfoje diras: *li daŭre laboris*. Sed tio ne estas samsignifa, ĉar ĝi signifas, ne ke li daŭrigis la laboron, sed ke li laboris longdaŭre. Oni diru do: *li laboris plu*.

2. Ĉe dudirektaj verboj en kombino kun akuzativa objekto: *admoni, deteni, devigi, ĝeni, instigi, instrui, kutimigi, peti, rajtigi* iun -i (iun pri -ado). Kelkaj el ĉi tiuj infinitivaj objektoj povas esti analizitaj ankaŭ per al-objekto montranta la celon (*admoni, instigi, kutimigi* al -ado); tamen, ĉar ankaŭ la pri-objekta analizo estas ebla, ni studas ilin ĉi tie. La subjekto de la infinitiva ago estas ĉiam la akuzativa objekto. Pri *peti* kun infinitivo kaj de-objekto vd. § 181, 4.

Rim. II. Kiam infinitiva komplemento de verbo povas esti analizata nek per akuzativa nek per traktativa objekto, ĝi ne estas objekto, sed tiaokaze ĝi povas esti

a) celadjekto; ekz-e *inviti, kondamni, sendi iun -i* (por -ado); ties pritrakton vd. en § 186;

b) atribua predikativa infinitivo (vd. § 172); ekzemple: *vidi, lasi, igi iun -i*. Inter ĉi lasta kaj la objekta infinitivo estas du gravaj diferencoj:

1. predikativa infinitivo troviĝas nur post la verboj de sensado (*vidi, aŭdi*) kaj ĉe *igi* kaj *lasi*;

2. la predikativa infinitivo povas esti anstataŭata de predikativa participo (*mi vidis, igis, lasis lin legi = mi vidis, igis, lasis lin leganta*), dum tia anstataŭigo estas absolute nebla ĉe la objektaĵaj infinitivoj.

LA ADJEKTOJ

183

La adjektoj (cirkonstancaj komplementoj) estas frazelementoj esprimantaj la diversajn cirkonstancojn de la ago aŭ de la atribuo. Ilin oni povas dividi laŭ du vidpunktoj: 1. laŭ la formo; 2. laŭ la speco de la cirkonstanco, kiun ili esprimas.

FORMO DE LA ADJEKTOJ

La adjektoj prezentiĝas en kvin diversaj formoj: laŭ tio ni distingas adjektojn: a) adverbajn, b) akuzativajn (rektajn), c) prepozitivajn (nerek-tajn), d) infinitivajn, e) nominativajn (absolutajn).

Adverbaj adjektoj

I. — La adverbo estas la regula formo, kiun alprenas adjektiva radiko por determini verbon (predikatan aŭ nepredikatan). Ĝi respondas al la adjektiva formo apud la ad-substantivo: *laŭte krii — laŭta kriad*o.

Krome, oni povas determini la verbon per ĉiuj primitivaj adverboj: *tro laŭdi; se vi sciis, kiu li estas, vi lin pli estimus²; li jam foriris; morgaŭ venu; preskaŭ fali; neniam li mensogis; iom suspekti; li ne estas tie ĉi*. Menciinde, Z. uzas tre antaŭ verbo, kiam francoj aŭ italoj emus uzi multe: *lia heroeco tre plaĉis al mi; ankaŭ mi tre amas iliajn infanojn; tre povas esti; mi tre* (ne: multe) *amas la bieron*. Tamen oni uzas multe antaŭ pli kaj plej: *li estas multe* (ne: tre) *pli alta ol mi*.

Fine oni povas uzi apud verboj adverbojn venantajn de neadjektivaj radikoj por montri:

lokon: *gapiri surstrate; esti hejme*;

tempon: *kantadi tage kaj nokte; ekskursi dimanĉe*;

aliajn cirkonstancojn: *senkore konduti; laŭekstere juĝi; malgraŭvole edziĝi; leone batali; letere respondi; krajone skribi*.

Pri la akuzativ-adverboj signantaj almovon vd. §§ 191-192.

II. — Speciale oni bezonas paroli pri la particip-adverboj. Ili ne povas, kompreneble, esprimi la lokon, sed per ili povas esti montrataj stato aŭ ago (aktiva aŭ pasiva), kaj ties antaŭeco, posteco aŭ dumeco rilate al la predikata ago: *promenante sur la strato, li falis²* (kiam li promenis); *falinte, li ne povis releviĝi* (post kiam li falis); *forironte, li premis mian*

manon (antaŭ ol li foriris).

Helpe de la kunteksto, tiu tempa interrilato inter la predikata kaj participa agoj povas esprimi ankaŭ aliajn cirkonstancojn de la predikata ago, kaj laŭ tio la particip-adjekto povas esti anstataŭigata per alispecaj subpropozicioj:

m a n i e r o: *nevidate mi enflugas en la domojn de la homoj^Z* (tiel ke oni min ne vidas); *eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton^Z* (tiel ke ĝi konstante frapas).

k a ŭ z o: *li forte laŭdadis la ĉevalon, dezirante ricevi ĝin donace^Z* (= ĉar li deziris...); *ni semas kaj semas, pri l' tempoj estontaj pensante^Z*; *la homaro, vidante la utilecon de lingvo internacia, ne restos anaro da ekzistaĵoj ne komprenantaj unu alian^Z*.

k o n c e d o: *povante ripozi, li preferis labori; ĉu povas ekzisti homoj, kiuj, sciante ke la tero estas globo, povas dubi, ke al ĉia lando oni povas veni de oriento kaj de okcidento?^Z*

s u p o z o: *en infero loĝante, kun diabloj ne disputu^Z*; *la regnoj, kiuj sin detenas, pli bone informite pri siaj devoj, ne prokrastus subskribi tiun traktaton^Z*.

k o n d i ĉ o: *aldonante la prefikson "nen", ni ricevas vortojn neajn^Z*; *neniam insultu, ne parolinte kun la insultoto^Z*; *mi havas celon, kiun mi povas atingi nur ekriĉiginte (K)*.

La diferencon inter la adjektiva kaj la adverba participo Z. klare formulis en L.R. (N-ro 117): "Se ni deziras per participo esprimi la sencon: *kiu...-as*, tiam ni devas uzi nepre la adjektivan formon de la participo; la adverbformon ni uzas nur anstataŭ: *kiam li (ĝi, ŝi ktp) ...-as aŭ ĉar ...-as*. Anstataŭ: *la unuaj vojaĝantoj, kiuj traveturas Eŭropon*, ni devas diri: *traveturantaj*. La vorto "traveturante" signifus: *kiam ili traveturas*."

La propra karaktero de la adjekta participo estas, ke ĝi povas esti uzata nur rilate al la subjekto de la finitiva verbo, de kiu ĝi dependas, ĉu tiu verbo estas ĉef- aŭ sub-propozicia: *ironte promeni, purigu vian veston^Z*; *li venis tute ne atendite^Z*; *mi admiris Neptunon, kiu rajdas sur malbela fiŝo, levante sian minacantan forkegon; la fraŭlino plu paŝis, dum ili, ŝtonigite de admiro, sekvis ŝin per la okuloj*. Tiu deviga rilateco al la subjekto ebligas eviti miskomprenojn, kiam la participo ne staras tuj apud la subjekto: en *brulas la flamo en via koro, neniam malfortigante^{eZ}*, la adjektiva formo *malfortiganta* estus dubsenca, ĉar ĝi povus rilati al *koro*; per la adverba formo oni forigas ĉian dubon.

En Esperanto do ne ekzistas participo absoluta.

Rim. I. Oni trovas ĉe Z. plurajn ekzemplojn, kiuj kontraŭdiras tiun regulon, tamen formulitan de li mem en L.R. (N-ro 118), ke "la adverba participo ĉiam rilatas la subjekton de la ĉefa propozicio". Tiujn esceptojn oni povas klasi en tri kategoriojn:

1) Kvankam la adverbo verbradika povas havi tiel same pasivan, kiel aktivan signifon (vd. § 286, Rim. II, § 296, B. 2.), Z. sentis, ĉe kelkaj, la bezonon akcenti la

pasivecon per enmeto de la it-sufikso: *mi tion faradis ne pro ne sufiĉa pripenso, sed tute pripensite* (= pripensinte) *kaj intence; ĝuste tion mi kaŝite* (= sekrete) *deziris al mi; la burĝono... enhavas en si, kvankam kaŝite* (= nevideble), *ĉiujn ĝermojn por folioj kaj semo*. Kelkaj aliaj aŭtoroj uzis same, por eviti dubsencan: *ŝi havis frapante* (= okulfrape) *belan korpon; la knabo montris konfuzite ruĝajn vangojn* (= vangojn ruĝajn de konfuziĝo).

2) Sub la influo de naciaj lingvoj, Z. uzis particip-adverbon anstataŭ subpropozicio, kiam persona subjekto ne estas: *komencante* (se komenci) *de la kampara dometo... kaj finante* (= se fini) *per la infanaj vizaĝetoj, ĉio portis sur si la stampon... de bone esprimita karakterajo; deprenite* (= se depreni) *dek de dekkvin, restas kvin*. Ĉe aliaj, same: *ne parolante* (= se ne paroli) *pri la kruroj de la portreto, la piedoj ankaŭ estas tro longaj; li vere estas bonŝanca homo, konsiderante* (= se konsideri) *ke li transnaĝis la krizon riĉa; eĉ rigardante* (= se rigardi) *la malaltan prezon, la negoco ne estos profita*.

3) Fine. Z. uzis la particip-adverbon predikative, rilatigante ĝin al la objekto de la frazo: *la kapon ankoraŭ ĉiam tenis li turnite* (= turnita aŭ turnitan) *al mia flanko* (Haml. 46); *li estas kiel granda rado, portanta sur radioj la potencaj ligite* (= lig-itajn) *milionojn da estaĵoj* (Haml. 97); *ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj tute ne korektite* (= korektitaj) *tiujn samajn erarojn* (Antaŭparolo al la Fundamento); *mi la miajn vidas urĝante* (= urĝantaj) *en danĝero* (lf. 84); *ili iris kaj tenis la manojn eltirite* (= eltiritaj) *en la aero* (And. I. 71); *li sidis, tenante ambaŭ manojn forte alpremite* (= alpremitaj) *al sia ruĝa ĉapo* (And. III. 54); *vi tenis min entombigite* (= entombigita) *en via koro* (And. IV. 120). Same ĉe aliaj: *mi sendas al vi ĉi-enmetite* (= ĉi-ene) *ĉekon* ktp.

Kvankam, kiel oni vidas, Z. uzis tiun dirmanieron tra sia tuta verkaro, oni ne povas ĝin aprobi, des pli ke la adverbiaj formoj havas nenian evidentan avantaĝon super la adjektivaj, estante nek pli belsonaj, nek pli koncizaj. Ni do forte konsilas ne imiti lin en tiaj deflankiĝoj de la regulo, kaj uzi la ekvivalentojn, kiujn ni montris interkrampe, adverbojn, absolutan se (vd § 268) aŭ particip-adjektivojn. Nia plej supera regulo estas la klareco, kaj ĝuste por ĝin certigi Z. elpensis la adverban particon: estus ja konfuzo, se tiu ne-varia, do sintakse neakordigebla adjekta participo povus rilati al pluraj vortoj en la sama frazo; se ekz-e en *li staris tenante la bastonon apogite al la muro*, la vorto *apogite* povus determini jen *li-n*, jen *la bastonon*; se legante la frazon: *mi sendas al vi ĉi-enfermite unu poemon*, oni ne povus diveni, ĉu la *poeto* estas enfermita en malliberejo, aŭ la *poemo* en la letero. Oni do tenu sin strikte al tio, ke adverbaj participo povas determini sole la subjekton de la propozicio.

Rim. II. Atentu ne konfuzi la adjektan particon kun la adverbo: tiu lasta povas rilati al la verbo aŭ konsistigi kunmetitajn prepoziciojn aŭ subjunkciojn, dum la unua devige rilatas al la propozicia subjekto. Se oni diras: *ŝi venos, supoze ke ankaŭ vi venos*, tio signifas: *ŝi venos je tiu kondiĉo, ke...* sed, se oni diras: *ŝi venos supozante, ke ankaŭ vi venos*, tio signifas: *ŝi venos, ĉar ŝi supozas...* Same en: *li alportis ĉiujn librojn, escepte tiun*, la adverbo egalvaloras kiel: *krom tiu*; sed en: *li alportis ĉiujn librojn, esceptinte tiun*, la adjekta participo signifas, ke li vole esceptis la koncernan libron.

Akuzativaj (rektaj) adjektoj

Per akuzativa adjekto oni povas en E-o esprimi:
la celon de movo: *mi iras Berlinon*;

manieron: *pendigi tiun ĉi kanaĵlon sub la ĉielo la kapon malsupren*²;
 mezuron: *li estis tri paŝojn de la ŝtuparo*;
 daŭron: *esti tombisto tridek jarojn*²;
 tempopunkton: *la dudekan de Marto*.

Rim. I. Laŭ la ĉi-supra ekzemplo "*oni pendigis la kanaĵlon, la kapon malsupren*", R. Schwartz iniciatis esprimi per akuzativo la korpoparton, pri kiu ia stato temas, kaj la particon aŭ adjektivon, kiu esprimas ĉi tiun staton, meti en nominativon, kvazaŭ predikativon: *li sidis, la brakojn kunmetitaj; ŝi vagadis, la okulojn ruĝaj de ploro*. Kiel bone videble, en ĉi tiu konstruo oni elizias "havante". Teorie ĉi tiu turno estas pravigebla: la praktiko montros, ĉu ĝi enradikiĝos kiel interesa Esp-a idiotismo, aŭ pereos, kiel malfacila komplikaĵo. Ĉuokaze, laŭ nia opinio, ĝi havas du postulojn: la akuzativa aĵo devas esti korpoparto aŭ konsistiga parto de la ĉef-subjekto, kaj la ĉefpredikato devas esti netransirata verbo.

Rim. II. Oni vidas, ke la akuzativo ludas en E-o multajn rolojn: tio okazigas, ke en ĝi oni povas tre ofte uzi akuzativon, pli ofte eĉ ol en iu ajn nacia lingvo. Tamen, oni devas preferi prepozitivon ĉiufoje, kiam en la sama prop-o enestus du akuzativoj senprepoziciaj. Frazoj kiel: *la viro prenis oran ringon havantan la pezon de...*²; *tio alkondukis min ĉi tien la duan fojon*² estas malbonstile pezaj.

Prepozitivaj (nerektaj) adjektoj

Ĉiu prepozicio povas, kun postsekva substantivo, formi adjekton. La signifo de la adjektoj dependas de la senco de la prepozicio. Sed, ĉar la imageblaj cirkonstancoj, esprimendaj per la prepozitivaj adjektoj, estas pli multaj ol la nombro de la prepozicioj, multaj prepozicioj povas havi tutan serion da signifoj.

Ni ne klarigos tie ĉi por ĉiu prepozicio aparte la serion de ĝiaj signifoj. Tio ja koncernas la leksikologion, kaj oni trovos en la Plena Ilustrita Vortaro tiun materialon, pritraktitan kaj orditan de unu el la aŭtoroj de tiu ĉi gramatiko. Ni citos do sube, ĉe la specoj de la adjektoj, ĉiun prepozicion nur okaze de la esprimota rilato.



La diversajn formojn de la prepozitivaj (nominativ-, prepozitiv-, akuzativ-prepozitivaj) ni pritraktis jam en la Morfologio (§ 121). Ĉi tie ni okupiĝos pli detale nur pri la *duopaj prepozitivaj* kaj *interprepozitivaj*.

Ĉe la *duopaj prepozitivaj* oni povas distingi la jenajn okazojn:

1. la du prepozitivaj estas simple interligitaj; la unua estas demova, la dua almova, kaj ili kune montras mezuron: *de kapo ĝis piedoj; de mateno ĝis vespero*; aŭ pason: *de domo al domo; de mano al mano*.
2. la dua prepozitivo estas suplemento de la unua substantivo kaj la enkonduka prepozicio rilatas kune al la tuta postsekva komplekso. Tiujn ĉi duopajn prepozitivajn oni povas dividi ree en du grupojn:
 - a) la unua substantivo montras objekton, la suplemento montras ties lokon, la enkonduka prepozicio rilatigas la tutan kompleksan al la prepozicia subjekto aŭ objekto, indikante kunecon (**kun**) aŭ senecon (**sen**): *li venis kun glavo en la mano; li promenis sen ĉapelo sur la kapo*. La

suplementa substantivo montras ĉiam korpoparton aŭ konsistigan parton de la rilatata subjekto aŭ objekto: *kun standardoj sur la balkonoj, la domo aspektas solene*.

Rim. I. Ĉar la unua substantivo formas kun sia suplemento nedisigeblan tuton, oni ne povas inversigi tiajn prepozitivojn. *Li iris sur la kapo sen ĉapelo* signifus, ke sur la kapo li iris ne havante ĉapelon.

Rim. II. Oni ne uzu akuzativon anstataŭ la enkonduka kun: *lancon en mano li rajdis* estas almenaŭ nekutima. Fakte, kunecon neniam povas esprimi akuzativo.

b) la unua substantivo montras konsistigan parton de la prop-a subjekto aŭ objekto kaj la dua prepozitivo esprimas ties staton: *la sama afero sed kun la kapo al tero*. La duan prepozitivon povas anstataŭi adverbo: *li falis kun la kapo malsupren*.

Rim. III. Ĉi tie kun ne esprimas kunecon, sed estas simpla gramatika ligilo (la kuneeco de konsistiga parto rilate al ties posedanto ja estas evidenta). Do, kiel tia gramatika ligilo povas funkcii ankaŭ akuzativo: *renversi ĉion la supron malsupren*². Vd. ankoraŭ § 187.

3. Se du substantivoj samaj estas ligitaj prepozicie, tiajn duoblajn reciprokajn formulojn oni povas nomi *interpozitivo*, ĉar la prepozicio estas intermetita. Z. rigardas tiajn kompleksojn kiel adverbojn kaj uzas ilin tute sen gramatika ligilo: *mano en mano ili eliris; ni paŝo post paŝo atingos la celon; tago post tago venis novaj trupoj*. Kvankam la eldonintoj de la Londona Biblio korektis ĉiujn tiajn esprimojn (*vizaĝo kontraŭ vizaĝo en vizaĝon kontraŭ vizaĝo* — "Eliro" 33. 11. kaj en ĉiuj aliaj lokoj), ili estas tute klaraj, neniam povas esti konfuzon kaj sekve ni konsilas ilin uzi en la formo preferata de Z., t.e. sen gramatika ligilo.

Infinitivaj adjektoj

186

Ankaŭ infinitivo povas funkcii kiel adjekto. La infinitiva adjekto povas esti rekta (senprepozicia) kaj nereкта (prepozicia).

1. La rekta infinitiva adjekto havas la funkcion de celadjekto. Ĝi estas uzata:

a) kiam la predikata kaj infinitiva agoj ne havas identan subjekton: *inviti iun paroli; oni kondamnis lin labori en pundomo; mi sendos (subkomprene: iun) venigi kuraciston*²; *li sendis ŝin promeni; oni vokas la bovon ne festeni sed treni*²; *mi tiros mian glavon en temp' alia, pli terure bati*² (batos la glavo); *ĉiun, kiun tiris lia koro entrepreni la laboron*²; *tiu homo, kiun sorto vipis la mondon elpurigi uragane...* Por tiaokaze estas malĝusta.

b) ĉe subjekt-identeco, post la verboj de movado: *kiu rabi eliras, ofte nuda revenas*²; *iru serĉi la azeninojn*²; *ŝi tuj kuris bati ŝin*²; *ili veturis trarigardi la landon*²; *iru dormi; li venos vin viziti*; tre malofte, precipe en poezio aŭ proverboj, post aliaj, netransitivaj verboj, *anim'*, *kiu batalas liberigi*²; *kiam mi kuŝiĝas dormi*?²; *ve, ke mi naskiĝis esti la punanto!*² aŭ post pasivoj: *domoj neloĝataj, destinitaj esti ŝtonamasoj*²; *sed*

*la papero ne estis sendita vojaĝi*².

2. Nerekta ninfinitivan adjekton oni trovas kun la prepozicioj: **por**, **anstataŭ** kaj **krom**, krome kun **antaŭ ol** kaj **post ol**, malofte kun **sen** kaj **inter**. Ekzemplojn vd. § 117, 4. *dd.* kaj 255, B.

Tiuj adjektoj estas parencaj al la prepozitivaj adjektoj. Sed ekzistas tri diferencoj:

a) nerektaj infinitiv-adjektoj povas formiĝi nur kun la supre cititaj prepozicioj;

b) la infinitivo povas havi predikatajn komplementojn (objekton, adjektojn).

c) la subjekto de la infinitiva ago devas identi kun la subjekto de la ĉefpredikato. Escepto estas nur post **inter** kaj, malofte, post **por** (vd. absoluta **por**, § 268. I.).

Nominativaj (absolutaj) adjektoj

Ĝenerale ŝajnas kontraŭa al la spirito de Esp-o, starigi adjekton en nominativo, sen gramatika rilatigilo. En pluraj lingvoj ekzistas tia frazkonstruo, ke ia cirkonstanco estas esprimita per epiteto aŭ suplemento de substantivo, kaj la substantivo mem staras en senprepozicia, nominativa formo. En Esp-o tio estas malĝusta. Oni do ne povas diri: *ili restis sub la pluvo*, *la kapo nuda*; *li parolas*, *la ĉapelo sur la kapo*, sed oni devas uzi prepozicion: *kun kapo nuda*; *kun ĉapelo sur la kapo* (Vd. ankaŭ § 184. Rim. I.). Ni jam vidis (§ 183), ke en Esp-o ne ekzistas participo absoluta; tio rilatas ne nur al la particip-adverbo, sed ankaŭ al la particip-adjektivo. Anstataŭ: *la ponto rompita*, *la malamiko ne povis retiriĝi*, oni do diru: *pro la rompo de la ponto...* aŭ: *ĉar la ponto estis rompita...*

Rim. I. En la unuaj jaroj de la lingvo Z. kelkfoje uzis neŭtran demandan aŭ rilatan pronomon nominativan en adjekta funkcio: *kio min koncernas*, *mi ŝajnis...*; *kio vin interesas mia farado?* *kio ĝi min interesas*, *ke vi havas edzinon?* *kio li parolas sole pri aferoj tute sensignifaj?* Sentante mem la fremdecon de tia uzo, li poste anstataŭigis ĝin per akuzativa adjekto: *kion tio ĉi malhelpas?* "Batalo de l' Vivo"; *kion ni estas kulpaj?* "Rabistoj"; *kion ĝi min interesas?* "Marta". Nek unu nek la alia el tiuj konstruoj estis imitata. Prefere oni uzu la pli klarajn esprimojn: *kiom min koncernas*; *kiom ĝi min interesas?* *pro kio (kial) li parolas sole...*

Tamen, ankaŭ en Esp-o ekzistas tri specoj de nominativaj, absolutaj adjektoj:

1. identiga stat-adjekto esprimita per adjekta predikativo (vd. § 197, Rim., kaj § 256);

2. la interpozitivaj (vd. § 185. 3.);

3. formuloj, en kiuj la cirkonstancon esprimas adverbo, rilatanta same al la predikata verbo kiel al iu substantiva frazelemento, kaj plenumanta per tiu interligado la funkcion de gramatika rilatigilo: *ĉio transturniĝis*, *la fundo supren*(F.K.); sed ofte oni uzas **kun** kiel ligilon (vd. § 185, 2.

b) aŭ akuzativon (samloke, Rim. III.).

Rim. II. Laŭ zamenhofaj ekzemploj oni povus eble starigi la regulon, ke oni uzu akuzativon, kiam la adjektsubstantivo estas rilatigebla al la predikato kiel objekto, kaj nominativon, kiam ĝi estas rilatigebla kiel subjekto: *pendigi la kanajlon la kapon malsupren*² (ĉar: *pendigi la kapon malsupren*); *ĉio transturniĝis la fundo supren*² (ĉar: *transturniĝis la fundo supren*). Cetere, oni ofte kunfandas tiajn esprimojn en unu kompleksan adverbon: *fali kap-al-sube*, *transturniĝi fund-al-supre*.

Pri adjekto adjektiva, vd. § 197, Rim.

SPECOJ DE ADJEKTOJ

- 188** La plej oftaj cirkonstancoj, kiujn oni bezonas esprimi per la adjektoj, estas la *lokaj* kaj la *tempaj*: la respektivaj adjektoj determinas la pozicion de la ago inter la kadroj de la spaco aŭ de la daŭro. La aliajn cirkonstancojn, kvankam tre diversspecajn, tamen oni povas klasi en tri grandajn kategoriojn: oni povas distingi tiujn, kiuj koncernas propre la aganton aŭ la agaton antaŭ, dum, aŭ post la plenumiĝo de la ago (*adjektoj stataj*); poste tiujn, kiuj koncernas la agon mem kaj diras kiel, pro kio aŭ por kio ĝi okazas (*adjektoj modalaj*) kaj fine tiujn, kiuj mem estas koncernataj de la ago ĉu preece, ĉu alece, ĉu dece (*adjektoj koncernaj*).

LA LOKAJ ADJEKTOJ

- 189** Per lokaj adjektoj oni povas esprimi jen la pozicion, en kiu estas aŭ agas objekto aŭ persono, jen la movon, kiun ĝi faras. Laŭ tio oni distingas lokadjektojn poziciajn kaj lokadjektojn movajn.

Lokadjektoj poziciaj

Por montri poziciojn, oni uzas puran prepozitivan, t.e. prepozicion plus nominativo. La ĉefaj prepozicioj kaj prepoziciaĵoj estas:

en

ekster, ekstere de

ĉirkaŭ, ĉirkaŭe de, ringe de

apud, ĉe, proksime de, flanke de

for de, malproksime de, distance de

kontraŭ, antaŭ, fronte al, vidalvide al, kontraŭvizaĝe al, ĉeeste de

malantaŭ, post, dorse al, poste de

sur, super, supre de, supraĝe de, surface de

sub, malsuper, sube de, malsupre (infre) de

inter, meze de, kerne de, centre de

trans, transe de, aliflanke de, sur la alia bordo de, maltrans (cis), ĉi-flanke de.

La sencon de la supraj prepozicioj vd. en la Plena Ilustrita Vortaro. Tie ĉi ni parolos nur pri kelkaj specialaj punktoj kaj uzoj.

1. **Antaŭ.** Krom la pure loka signifo (*la ĝardeno estas antaŭ la domo*)

ĝi povas signifi ankaŭ: *ĉeeste de: subskribi kontrakton antaŭ notario; pri tio vi respondos antaŭ Dio; diri ion antaŭ la tuta mondo; paroli antaŭ granda publiko.* Kp. § 212, 4.

Rim. I. La malo de **antaŭ** estas **post**. Tamen, por eviti konfuzon kun la tempa **post** oni ofte uzas **malantaŭ**.

2. La diferenco inter **ĉe** kaj **apud** estas, ke la unua montras tuŝan, la dua ne-tuŝan proksimecon. **Ĉe** estas uzata en la jenaj sencoj:

a) tuŝa proksimeco: *sidi ĉe tablo, fenestro; kuŝi ĉe ies flanko, ĉe la piedo de monto.* Oni ne uzu ĝin en senco: "interne de": *oni faris meson en la preĝejo (ĉe la preĝejo signifus, ke la altaro estis starigita ekster la preĝejo, ĉe ties muro).*

b) en la hejmo, domo de...: *loĝi ĉe iu^z; li estis ĉe si en la domo^z; en la lando de...: ĉe ni (en nia lando) ne estas venenaj serpentoj^z; ĉe la araboj estas kutimo, ke...*

c) en la firmo, metiejo, institucio, verko de...: *la libro aperis ĉe Hachette; la knabo lernas metion ĉe botisto; oni lin nomis instruisto ĉe provinca lernejo; li kunlaboras ĉe gazeto; ĉe la angla kortego...; ĉe bonaj aŭtoroj oni ne trovas tiun formon;*

d) pli-malpli metafore: *sidi ĉe glaso da biero; restu tajloro ĉe via laboro^z; teni sin ĉe sia vorto; vundiĝi ĉe la kokso; persisti ĉe io.*

Rim. II. Oni ne uzu ĝin en la senco: "kunporte de"; ĉi tie la ĝusta prepozicio estas **kun**: *mi ne havas kun mi monon; la leteroj ne estas kun mi. (La leteroj estas ĉe mi signifas: en mia domo).*

3. **Kontraŭ** kiel pozicia prepozicio havas nur la sencon: "fronte al, vidalvide al..."; tiel ĝi havas similan signifon al **antaŭ**: *li staras antaŭ ĉiuj, starigos sian tendon kontraŭ...^z; du vilaĝoj kuŝas sur la du bordoj unu kontraŭ la alia^z.* Sed **kontraŭ** povas havi ankaŭ sencon almovan (vd. § 190) kaj tial, en la pozicia senco, oni ofte uzas anstataŭ ĝi la supre montritajn ekvivalentojn, aŭ *kontraŭe de (al) ..., kontraŭflanke de (al) ...*

Rim. III. Oni trovas **kontraŭ** uzata ankaŭ en la senco de tuŝa proksimeco: *la balilo staras kontraŭ la pordo.* Tia uzo, tamen, estas tute konfuza, ĉar ĝi povas signifi, ke ĝi staras ĉe la muro kontraŭa al la pordo. Oni povas tion esprimi nur per: *apogita al (aŭ apoge al) la pordo.*

4. **Sub** propre signifas: "pli malalte ol la nivelo, ol la supra de...": *sub akvo, tero, maro, arbo.* La malo de **super** estus **malsuper**, sed, pro ties maloportuna longeco, oni uzas anstataŭe **sub**: *sub la ĉielo, tegmento, defluilo.* **Malsuper** estas uzata nur en la metafora vorto **malsupera** (malpli valora).

5. La diferenco inter **super** kaj **supre de** estas, ke la unua montras pli altan pozicion, la dua la plej altan parton de objekto: *super la domo* (pli alte ol la domo) – *supre de la domo* (en ĝia plej alta parto). En la lasta senco oni plej ofte uzas *supre en...*, aŭ *en la supra de...*

6. La diferenco inter **sur** kaj **super** estas analoga kiel inter **ĉe** kaj **apud**: la

unua montras tuŝon, la alia ne-tuŝon. Sed aliflanke, dum **super** montras ĉiam pozicion pli altan, **sur** povas montri ankaŭ same aŭ eĉ malpli altan: *bildo pendas sur la muro; muŝo sidas sur la plafono*. La diferenco inter ĉe kaj **sur** estas, ke la ĉe-adjekto montras nur tuŝan proksimecon, dum la sur-adjekto montras ankaŭ tenon, apogon: *la vesto pendas sur la muro* (estas fiksita sur la muro) – *la vesto pendas ĉe la muro* (sur apuda pendilo).

Rim. IV. Oni kuŝas *en lito*, se tiu estas metita por dormo, kaj *sur lito*, se ĝi estas nemetita: *ne kuŝu sur la lito, ĉar vi tute ĉifos la litkovrilon*. Same: oni sidas *en lito*, se tiu estas metita por dormo kaj la piedoj estas supre; sed oni sidas *sur lito*, se oni sidas sur ties rando, kaj la piedoj pendas, Oni sidas *sur seĝo*, sed *en apog-seĝo*, brakseĝo, fotelo. Ĝenerale oni uzas **sur** pensante pri du dimensioj, kaj **en** pensante pri tri: *sur la kampo jam velkis la herboj; li loĝas en la kamparo; li kuŝis sur la kajo; li laboras en la haveno*.

Z. konsilis uzi: *loĝi ĉe la strato N.*, sed li apenaŭ estas obeata. Vere, oni povus kompreni: loĝi en flankstrato de la strato N., tuj apude apud tiu ĉi. Plej logika ŝajnas: *loĝi en strato kaj promeni sur strato*.

7. **Trans** havas la signifon de rilato al la alia flanko: tiu rilato povas enteni ideon 1) de senmoveco (= sur la alia flanko), aŭ 2) de almovo (= al la alia flanko). De Hoog rimarkigis, ke Z. tre malofte uzis **trans** en la unua senco (*ili jam estas trans montoj kaj maroj*), krom se ĝin antaŭas alia prepozicio: *belaj rakontoj el trans la montoj* aŭ: *Mi prenis vian patron Abraham de trans la Rivero*. Tiun unuan sencan li kutime esprimas per **transe de**, kaj donas preskaŭ ĉiam al **trans** la nuancon de almovo, uzante tamen post ĝi nominativan adjekton: *pensoj iras trans limo sen pago kaj timo*. Kaj tion imitis sufiĉe multaj verkistoj: *Saltego trans jarmiloj* ktp. Akuzativan adjekton en tiu senco Z. ankaŭ ofte uzas, sen evidenta bezono. Mi volonte alprenos la konkludon de la studo de de Hoog:

- a) La prepozicio **trans** indikas movon, kiu etendiĝas ĝis pli malproksime ol ĝia komplemento.
- b) La trans-adjekto povas – laŭ la kunteksto – iafoje indiki la tiamaniere atingitan lokon. Ekz.: (a) *La aeroplano flugis trans la oceano*; (b) *Ili loĝas trans la oceano*.

Oni povas, sed ne bezonas, neprigi la ĉefan sencan (a) per la direkta **-n**, kaj la sekundaran sencan (b) per la uzo de **transe de**. *G.W.*

Cetere uzi **trans** en la tramova senco (iri trans la kampo, trans la planko) estas simpla eraro. Vd. § 190. 2.

Anstataŭ **maltrans** oni kelkfoje jam uzis **cis**.

Lokadjektoj movaj

190

Movon oni povas esprimi nur rilate al io senmova, sed tio povas esti jen fiksa punkto, jen tuta pozicio. La movo povas okazi malproksimiĝe de io, traire tra io kaj proksimiĝe al io. Ni distingos do la demovon, tramovon kaj almovon.

a) **M o v o r i l a t e a l p u n k t o .** Oni uzas aŭ prepozitivon aŭ akuzativon.

1. *Demovo.* Ĝi estas ĉiam esprimata per prepozitivo, helpe de la prepozicioj:

d e : *mi venas de la hejmo;*

e l : *ne gutas mielo el la ĉielo²; trinki el glaso;*

f o r d e , d i s d e : *ili iris for de la domo;*

e k d e (por signi la komencan punkton): *oni kuris ekde la ponto ĝis la preĝejo.* Oni uzas ekde ankaŭ metafore por eviti konfuzon kun la aliaj sencoj de de: *ĉiuj oficiroj, ekde la vicloŭtenantoj...* Ĉar ek estas prefikso, ekzistas neniu motivo por skribi "ek de" per du vortoj, kio cetere konfuze pensigas pri la interjekcia ek (Vd. § 125).

2. *Tramovo.* Ĝi estas ĉiam esprimata helpe de prepozicio. La speciala prepozicio estas tra.

En ĉi tiu ĉapitro ni pritraktas tiujn tramovojn, ĉe kiuj la movlinio kontaktiĝas kun la aĵo signita de l' adjekt-substantivo. La ceterajn tramovojn vd. § 191. 2.

La rilatoj inter la mov-linio kaj la adjekto diferencas laŭ tio, ĉu la adjekto indikas punkton, linion, ebenon aŭ spacon. Ni devas do dividi laŭ tio la adjektojn.

a) **P u n k t o .** Tio estas la plej simpla okazo; oni uzas simple tra: *la diametro kuras tra la centro de la cirklo.*

b) **L i n i o .** La movo povas tuŝi la linion

aa) paralele; oni uzas sur aŭ en: *iri sur relo; flugi en vertikala direkto.*

Por signi, ke la movo pasas sur la tuta linio, oni povas uzi tra prefiksoide: *trairi sur ŝnuro;* aŭ trans, se oni akcentas la pludaŭron de la movo: *transiri sur ponto.*

Rim. I. Se la adjekt-substantivo signas mem movon, oni uzas laŭ por signi, ke la du movoj kuras samdirekte; kaj kontraŭ por signi la malon: *naĝi laŭ la fluo; flugi kontraŭ vento.*

bb) perpendikulare; oni povas uzi simple tra: *tiri linion tra alia;* por certigi la sencon oni povas aldoni kruce: *streĉi draton kruce tra alia.*

c) **E b e n o .** La movo okazas

aa) inter la randoj de la ebena, ne tuŝante ilin; oni uzas sur: *muŝo kuras sur la fenestro.*

Rim. II. Oni uzas kelkfoje ankaŭ laŭ en tiu ĉi senco. Sed ĝi ŝajnas malpli konsilinda, ĉar: unue, laŭ montras difinitan direkton kaj tian povas certigi nur linio, sed ne dudimensia ebena; due, laŭ montras sentuŝan movon: *iri laŭ la rando,* ekzemple, signifas, ke la movo okazas *apud* la rando, ne sur ĝi. Ankoraŭ malpli ĝusta estas trans, kies senco estas *en la alia flanko.* "Mi vidis kuri infanon trans la kampo", signifas, ke la kampo troviĝis inter mi kaj la kuranta infano.

bb) de unu rando al alia; oni uzu sur kaj prefiksoide tra: *muso trakuris sur la planko;* tra ĉi tie signas: "de unu ekstremo al alia" kaj sur malhelpas konfuzon kun la okazo cc).

cc) perpendikulare, trapike; oni uzas simple tra: *pafi tra tabulo.* Same

tra estas uzata, se la ebena estas **aperturo**: *pelu mizeron tra l'pordo, ĝi revenos tra l'fenestro*^Z. Por certigi tion ĉi kaj krome por signi, ke la movo post la traĵo daŭras plu, **Z.** uzas plurfoje **tra** kun akuzativo: *lumi tra mantelon*^Z; *ĵeti rigardon tra fenestran vitron*^Z. Tio, tamen, preskaŭ ĉiam ŝajnas superflua.

dd) se la ebena estas oblonga, oni povas uzi **laŭlonge sur** por signi, ke la movo okazas laŭ la pli longa akso kaj **laŭlarĝe sur** por signi la malon.

Rim. III. Por signi, ke la movo okazas en la kutima direkto sur la ebena, oni uzas **laŭ**; la malon signas **kontraŭ**: *karesi katon laŭ (kontraŭ) la haroj*.

d) **E b e n o p l u s s p a c o.** Ekzistas vortoj, kiuj signas ebenon kune kun la spaco troviĝanta super ĝi (kampo, arbaro, strato, dezerto, stepo ktp.). Ĉe tiuj vortoj la tramovon oni signas per **tra**: *tra la kampo; tra la arbaro; tra la stepo; li vagas tra sablaj dezertoj*^Z; *iri tra ĉambro*. Ankaŭ la laŭlongan tramovon oni povas esprimi per **tra**: *iri tra strato*^Z, sed pli konsilinde estas uzi tie ĉi **sur**. La laŭlarĝan tramovon en oblonga spaco sur ties malsupra ebena **Z.** esprimas per prefiksoida **trans** kun akuzativa adjekto: *transkuri la straton*^Z (kuri de unu flanko sur la alian). Oni povas uzi ankaŭ **transen en**.

Rim. IV. *Kuri trans la strato* signifus, ke oni kuras en alia strato, kiu estas trans tiu, pri kiu oni parolas. *Kuri trans la straton* signifus, ke oni kuras en alia strato kruca, tranĉas laŭlarĝe la respektivan straton kaj eble kuras plu transflanke en la kruca strato.

e) **S p a c o.** Oni uzas **tra**: *fulmoj trakuris tra la malluma ĉielo*^Z; *tra la ventego la voĉo ne aŭdiĝas*.

3. **Almovo.** Ĝi estas esprimata per prepozitivo aŭ per akuzativo.

La prepozitivo konsistas el la prepozicioj al aŭ ĝis. Ĉar ili per si mem montras la almovon, oni neniam bezonas uzi apude la akuzativon: *mi iras al Parizo; li kuris ĝis la stratangulo*.

La akuzativo montras propre la direkton de la ago, kio klarigas, ke oni uzas ĝin samtempe por montri la objekton kaj la direktadjekton: en "mi iras Parizon" kaj "mi amas la patron", *Parizon* kaj *patron* estas la punktoj, kiujn celas, trafas la fizika aŭ metafora movo, ago aŭ sento. La uzo de tiu direkta akuzativo pli kaj pli disvastiĝis kun la kreskado de la lingvo; ĝi uziĝas ne nur kun la substantivoj, sed ankaŭ kun la lokaj adverboj: *reveni hejmen, fali teren, leviĝi ĉielen* ktp. Nun oni ĝenerale preferas ĝin al la aliaj esprimrimedoj, kaj plivole diras "iri lernejon" ol "iri al lernejo". Oni trovas ĝin eĉ post mov-indika substantivo: *devas ekzisti okcidenta vojo Hindujon*^Z.

Rim. V. La akuzativo estas uzebla nur, kiam oni atingas la *internon* de la celo: *iri Parizon, lernejon, preĝejon*. Do oni ne povas diri: *iri sian amikon; kuri arbon, stratangulon, standardon fiksitajn mezojn de kampo*. Sed oni uzas ĝin tiamaniere, kiam la verbo havas prepozicion prefiksoida: *aliri sian amikon, alkuri arbon, stratangulon, suriri monton*. Tio eĉ estas preferinda al la ripeto de l' prepozicio. Sed oni ne uzu akuzativon, se la prepozicia prefiksoido havas sencon demovan (vd. § 373, Rim. IV.).

Al signifas ne nur direkton, sed ankaŭ atingon: *kuru al la arbo kaj al-portu frukton*. Do Esp-o ne havas prepozicion por esprimi nur la direkton de la ago; oni devas uzi la iom pezan prepoziciaĵon en la direkto de... (aŭ direkte al...). Anstataŭe eble oni povus provi ale al: *li iris ale al sia amiko*.

Ĝis ne signifas simplan atingon, sed enhavas ankaŭ la insistan sencon, ke la atingita objekto estas la celo de la movo, do ke la movo ne daŭras plu. Krome, ĝi insistas pri tio, ke la movo havas sian celon en si mem. Oni do ne povas diri: *li iris ĝis sia amiko por premi lian manon*.

La almovon oni povas esprimi ankaŭ per la prepozicio kontraŭ. Sed la origina senco de kontraŭ estas pozicia, oni do povas ĝin uzi en almova senco nur post verboj, kies senco helpas, neprigas la sencon almovan: *li venis kontraŭ mi; li iris, flugis, sin ĵetis kontraŭ li*. Sed: *li levis sian vizaĝon kontraŭ mi* ja povas signifi, ke li staris kontraŭ mi, kaj sian vizaĝon li levis ekz-e al la plafono. Z. uzas ĉi-okaze akuzativon (vd. § 191.): alifoje oni povas uzi la prepoziciaĵon renkonte al: *renkonte al li iras virino*².

B) M o v o r i l a t e a l p o z i c i o. Por esprimi ĝin, oni ĉiam bezonas kunigi du esprimrimedojn, jen prepozitivon kun du prepozicioj (prepozitiv-prepozitivo), jen prepozitivon kun akuzativo. Oni esprimas la koncernan pozicion per la prepozicioj montritaj sub § 189, kaj oni aldonas al ili la taŭgajn movajn prepoziciojn aŭ la akuzativon.

1. Demovo. Ĝi estas ĉiam esprimita per prepozitiv-prepozitivo: *de antaŭ, de apud, de ĉe, de ĉirkaŭ, de el, de inter, de sub, de super, de sur;*

el antaŭ, el inter, el post, el sub, el trans.

Ekzemploj:

kombino kun de: *Jakob eliris de antaŭ sia patro*²; *eliris de apud li ĉiuj*²; *ŝi prenis mian filon de ĉe mi*²; *foriru de ĉirkaŭ la loĝejo de Korah*²; *kampo aĉetita de el la filoj de Het*²; *ne forpreniĝos regbastono de inter iliaj piedoj*²; *oni prenos vian litafon de sub vi*²; *voĉo parolanta al li de super la fermoplato*²; *la pafistoj pafis sur viajn servantojn de sur la muro*²; *ili ekstermiĝis de sur la tero*²;

kombino kun el: *eliris fajro el antaŭ la Eternulo*²; *popolo kolektita el inter multaj gentoj*²; *via Dio, kiu elirigis vin el sub la jugo*²; *belaj rakontoj el trans la montoj*².

2. Tramovo. Tie ĉi ni pritraktas tiujn tramovojn, ĉe kiuj la movlinio ne kontaktiĝas kun la aĵo signita de l' adjekt-substantivo, sed tranĉas nur pozicion rilatan al ĝi. La prepozicioj estas apud, laŭ, inter, preter, super, sub, solaj aŭ kombinitaj kun tra aŭ trans.

Rim. I. Apud emfazas la proksimecon, laŭ la direkton, preter tion, ke la tramovo estas nur pli-malpli granda parto de la tuta farata movo.

a) P u n k t o. La apudan tramovon signas preter: *flugi preter turpinto*. La suban aŭ supran sub aŭ super kun trans (prefiksoido): *transflugi super montpinto*.

b) **L i n i o**. Oni uzas, ĉe apuda movo, **apud**, por signi simplan proksimecon: *iri apud rivero*; **laŭ** por emfazi, ke la adjekto difinas la direkton de la movo: *iri laŭ la rivero*; *li venas laŭ la ŝtuparo*^z; **preter** por signi, ke la movo jam komenciĝis antaŭ la tramovo kaj ankaŭ daŭros plue: *kuri preter muro*. Ĉe suba aŭ supra movo, se ĝi estas paralela al la respektiva linio, oni uzas **sub** aŭ **super**: *iri sub telefondrato*. Se ĝi estas perpendikulara, oni uzas krome **trans** prefiksoide: *transsalti super la reloj*.

c) **E b e n o**. Apudan tramovon signas: **apud**, **preter** aŭ **laŭ la rando de** (samsence kiel ĉe la linio). Suban aŭ supran **sub** aŭ **super**, kun prefiksoida **tra**, se oni volas signi, ke la tramovo iras de unu rando al alia: *trarampi sub la tolo*, aŭ **trans** por signi, ke la movo daŭras plue: *transflugi super tegmento*; *transnavigi sub ponto*.

Rim. II. Inter *transflugi super tegmento* kaj *flugi trans tegmenton* estas nuanca diferenco. La unua signas simplan tramovon; la dua akcentas, ke la celo de la flugo troviĝas trans la tegmento.

d) **S p a c o**. La afero estas simila, kiel ĉe la ebena: *kuri preter domo*, *apud domo*, *super domo* ktp. Sed anstataŭ *laŭ la rando*, oni diras *laŭ la surfaco*.

e) **I n t e r s p a c o**. Oni uzas **tra inter**: *la suno brilas sur lin tra inter la branĉoj*^z; *tra inter liaj lipoj venis jenaj vortoj*... Kompreneble **tra inter** anst. la simpla **tra** estas necesa nur, kiam la adjekt-substantivo signas nur la periferion de la interspaco (ekz-e lipoj). Cetere temas pri simpla spaco kaj sufiĉas **tra**: *fluigi akvon tra tubo*.

3. **Almovo**. Ĝi estas esprimata jen per prepozitiv-prepozitivo: *la muso kuris al sub la lito*; *mi akompanis lin ĝis en lia domo*; *droni en laboroj ĝis super la oreloj*^z;

jen, kaj plejofte, per prepozitiv-akuzativo: *la muso kuris sub la lito*; *li venis en la lernejon*; *ŝi elportis tion ekster la urbon*^z; *li kuris inter la knabojn*; *li metis sakon ĉirkaŭ sian lumbon*^z.

La diferenco inter tiuj du esprimrimedoj estas, ke la prepozitiv-akuzativo per si sola egalvaloras al kaj **ĝis**: ĝi montras samtempe la direkton (**al**) kaj la atingitecon (**ĝis**). Eble tial ĝi estas multege pli uzata ol la prepozitiv-prepozitivo. Ĝia efiko estas eĉ tiel forta, ke ĝi sufiĉas per si mem por esprimi almovon, eĉ sen verbo de movo: *ŝteliston neniu lasas en sian domon*^z (= lasas eniri); *ŝi volis en kaleŝon*^z (= enveturiĝi en...).

Rim. III. La ŝajna kontraŭeco, kiu ekzistas inter la propra alcela signifo de la akuzativo kaj ĝia uzado post prepozicioj kiel *ekster*, klariĝas per tiu konsidero, ke en tiaj okazoj la celo estas ne la prepozicia substantivo mem, sed la pozicio esprimata per la *tuta* prepozitivo: *kuri ekster la urbon* egalas *kuri al la urb-ekstero*.

Speciala okazo estas la akuzativo post **kontraŭ**. Kelkfoje ĝi esprimas efektive movon al pozicio: *ŝi levis sian vizaĝon kontraŭ la plafonon*^z (en pozicion kontraŭan al la plafono). Sed aliffoje ĝi esprimas kuntuŝiĝon, kontaktiĝon: *frapi sin kontraŭ la muron*, *puŝiĝi kontraŭ ŝtonon*^z; *flugi kontraŭ muron*^z; *bati kontraŭ ies frunton*. Do en la okazoj, kiam la nominativ-prepozitivo signas direkton, la akuzativ-prepozitivo signas

atingitecon: *li fetis la pilkon kontraŭ mi*; – *kontraŭ min*. (Kp. § 190, 3.).

El la supraj klarigoj kaj ekzemploj oni vidas, ke en Esp-o, kontraŭe al multaj lingvoj, la akuzativo ne dependas de la uzo de tiu aŭ alia prepozicio, de tiu aŭ alia verbo, sed nur de la esprimota ideo: de tio, ĉu la prepozitivo estas la vera celo (direkto) de la movo aŭ ne. Tio klarigas kelkajn ŝajnajn esceptojn:

1. En pluraj okazoj oni povas uzi post verbo de movo puran prepozitivon sen akuzativo, se la vera celo de la movo estas ia alia vorto, esprimita aŭ ne. Tio okazas precipe ĉe la prepozicioj, kiuj esprimas la lokon ne per kontakto (*en, sur, sub*), sed per relativa situacio (*super, antaŭ, post, ĉirkaŭ, kontraŭ* ktp.). Oni do povas diri: *oni metis antaŭ mi sur la tablon manĝilon*², ĉar la celo estas la tablo kaj ne *mi*, kaj eĉ: *oni metis antaŭ mi manĝilon*². Same: *flugilojn viajn super mi etendu*² (en la aeron); *li kolektis ilin ĉirkaŭ si*²; *la ŝtono falis post mia dorso* (sur la teron); *meti komon post vorto* (sur la paperon); ĉe Z. oni trovas eĉ: *pensoj iras trans limo sen pago kaj timo*. Laŭ Z.: "estus bone, se ni alktumigu en ĉiuj okazoj *dubaj* preferi la nominativon". (Lingvaj Respondoj, 1908). Komparu ankaŭ la frazojn: *ili buĉis kapron kaj trempis la veston en la sangon* (Rabistoj, 1908); kaj... *kaj buĉis kapron kaj trempis la veston en la sango* (Genezo, 1911).

Tamen, se povas ekzisti malklareco, uzu la akuzativon. Ekz-e en la frazo: *Kain leviĝis kontraŭ sian fraton*², la akuzativo estas necesa por eviti, ke oni donu al *kontraŭ* la signifon de "vidalvide al"; same oni diros: *kuri post iun*, se temas pri persekuto (ĉar oni volas atingi la antaŭeniranton), kaj: *kuri post iu*, se temas pri trejnado (ĉar oni volas simple kure sekvi lin). Same: *li kuris inter ni* (meze de ni, kurantaj) estas tute alia ol *li kuris inter nin* (en la mezon de nia grupo); *venu apud mi* (paŝu tiel, ke vi restu apud mi dum mia irado) – *venu apud min* (proksimiĝu tute al mi); *la birdo flugis super la tegmenton* (de aliloke) – *super la tegmento* (samloke).

Rim. I. Logike oni povus uzi akuzativon ankaŭ kun ĉe: *venu ĉe min* (en mian domon). Sed la tradicio, sekvante la ekzemplon de Z., rigardas tian uzon nekorekta kaj aplikas anstataŭ ĝi la prepozicion al.

Efektive, ekzistas nenia motivo kontraŭ ĉe kun akuzativo. Kp. *stari apud la muro – iri apud la muron*; *stari ĉe la muro – iri ĉe la muron*. Same: *loĝi ĉe iu – transloĝi ĉe iun*. La argumento, kiun citas Lippmann, nome, ke ĉe estas uzata ankaŭ en tempa kaj kondiĉa sencoj, ne ŝajnas konvinka, ĉar ankaŭ en estas uzata en aliaj sencoj krom la loka. Cetere Z. uzas de ĉe: *ŝi prenis mian filon de ĉe mi*: sekve oni povus diri ankaŭ: *ŝi prenis mian filon al ĉe si*, aŭ pli simple, *ĉe sin*.

Neniam oni uzu akuzativon post la movaj prepozicioj: **de, el, preter, al, ĝis**, ĉar, ili per si mem jam esprimas sufiĉe la movon.

Pri la akuzativo post tra vd. supre ĉe la *Tramovo*.

2. Ĉe kelkaj verboj, oni povas dubi, ĉu ili esprimas movon aŭ komencon de nova stato, ekz-e: *sidiĝi, kuŝiĝi, ekkuŝi, apogi sin* ktp, precipe, kiam

ili staras en preterito. Post ili, tiel same kiel post *loki*, pro la sama jam citita kaŭzo, Z. konsilas uzi ĉiam la nominativon: *li sidiĝis sur seĝo; bastono apogita sur, kontraŭ la muro.*

Ankoraŭ pli validas tio pri la ek-kunmetoj: *eksidi sur seĝo* (= komenci sidi sur seĝo).

Meti estas "elasta verbo" laŭ Zamenhof: ĝi estas uzata ne nur en la senco *loki ien*, sed ankaŭ anst. *apliki, uzi* (ekz-e *meti demandon*). En tia senco, kompreneble, ĝi ne postulas nepre la akuzativon de direkto: *meti (apliki) punkton post frazo.*

Rim. II. Oni trovas, ĉe kelkaj verkistoj, kaj eĉ sporade ĉe Z., uzon de la akuzativo por montri ne la almovon, sed simple la movon, eĉ kiam la akuzativigita vorto tute ne estas la celo de tiu movo: *iri returnen, renkonten, tiudirekten, peli pluen.* Tiu uzo estas mallogika kaj nepre evitinda. Oni uzu tiujn adverbojn sen -n: *renkonte, returne, plue.* Sed oni uzas ĝuste *reen* (*tien kaj reen*); ĉar *reen* signifas *denove.*

Oni diru *en la direkto* (ne: *direkton*, krom se la direkto mem estas celo de almovo: *turniĝi en kontraŭan direkton*).

Rim. III. Kiam la verbo de movo estas kunmetita per loka prepozicio, oni povas ripeti tiun post ĝi: *la birdo deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis sur la tegmenton²; du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo².* Tiu regulo ne aplikigaĝas, kiam la prefikso modifas la signifon de la verba radiko (ekz-e transitivigaĝas ĝin, metaforigaĝas ĝin ktp.): *mi trapikus per mia spado ŝin kaj ŝian amanton²; transiri riveron, surverŝi bedojn* ktp. Sed ankaŭ cetere, ofte estas pli elegante uzi akuzativon anstataŭ ripeto: *eniri domon; surflugi tegmenton*; krom se la senco estas demova (vd. § 365, Rim. IV. kaj § 190, Rim. V.).

LA TEMPJAJ ADJEKTOJ

193

La tempaj adjektoj difinas la tempon de la ago. Ili povas difini ĝin per la tempo, kiam la ago okazas (momente aŭ daŭre); tiuj estas la *aktualaj tempadjektoj*. Kaj ili povas difini la komencon aŭ la finon de la ago; tiuj estas la *tempadjektoj komencaj kaj finaj*. Ili povas ankaŭ difini, kiomfoje ripetigaĝas la ago; tiuj estas la *nombraj tempadjektoj*.

Aktualaj tempadjektoj

La aktualaj tempadjektoj fiksas jen tempopunkton (ĉe la momentaj agoj), jen tempo-daŭron (ĉe la daŭraj aŭ ripetataj agoj).

I. **L a t e m p o p u n k t o n** la tempadjektoj povas fiksi laŭ du metodoj: aŭ helpe de kronologia sistemo aŭ relative al la momento, kiam oni parolas. La unuan metodon ni nomas *absoluta*, la duan *relativa*.

1. *Absoluta metodo.* Oni uzas diversajn prepoziciojn laŭ la senco de la tempadjekta substantivo:

a) se ĝi estas tago difinita per vicmontra numeralo aŭ per pronom-adjektivo, oni uzas plejofte la akuzativon: *Vaŝington estis naskita la dudekduan de Februaro²; ĉiun tagon; iun tagon*; kelkfoje la prepozicion *je*: *je la unua de Majo*. (Antaŭ la nomoj de monato oni elipsas la vorton

”tago”).

b) ĉe festotagoj oni uzas je: *je Pasko, Kristnasko, Pentekosto*.

c) la semajntagoj oni esprimas diversmaniere: per adverbo, se temas pri ĝenerala temp-indiko: *mi laboras de lundo ĝis vendredo kaj ripozas dimanĉe; merkrede la lernantoj restas hejme*. Se temas pri difinita tago, oni uzas akuzativon: *mi venos Parizon vendredon la 28.VII.²; mi intencas veni Bulonjon jaŭdon²; mi venos Bulonjon tra Calais vendredon je la horo 6,47 post tagmezo²*. Se la temp-indiko havas epiteton aŭ suplementon, oni uzas en: *en la sekvanta dimanĉo; en la sabato de Pasko*.

d) la horojn oni esprimas per je: *je la sesa matene*.

e) se la adjekt-substantivo estas per si mem tempodifinilo, oni uzas en: *en la jaro 1914; en la monato Majo; en la dekdua jarcento; en somero²; en la kvara minuto; en la sama momento*.

f) se la adjekt-substantivo per si mem ne estas tempodifinilo, oni uzas ĉe, kiu do havas ĉi-okaze la sencon: ”en la tempo de...”: *ĉe tagmanĝo; ĉe la subiro de l' suno; ĉe la alveno de la vagonaro; ĉe ĉiu sia vorto li pugnobatis la tablon*.

Rim. I. Post esti oni uzas nek akuzativon, nek prepozicion: *estas la deka; estis vespero²*. Tie ĉi do la tempdifinilo estas subjekto. Sed: *la sepan tagon estas sabato de ripozo²*, ĉar ĉi tie enestas vera subjekto (*sabato*) kaj *la sepan tagon* egalvaloras: *en la sepa tago*.

Proksimuman, neprecizan tempo-punkton oni esprimas per diversaj prepozicioj: **antaŭ**: *tio okazis antaŭ Kristnasko* (en iu tago antaŭ K.); **post**: *li revenos nur post dimanĉo* (en iu tago post d.); **ĉirkaŭ**: *mi vizitos vin ĉirkaŭ Pasko* (en iu tago antaŭ aŭ post P.). **Antaŭ** signas, ke la plej malfrua tago estas la ĵus antaŭa: *mi sendos la artikolon antaŭ dimanĉo* (plej malfrue en sabato). Se la plej malfrua dato povas esti ankaŭ la esprimita dato mem, oni povas uzi **por** aŭ **ĝis**: *mi sendos la artikolon por (ĝis) dimanĉo* (plej malfrue en dimanĉo).

Rim. II. Ĝis povas esti uzata en tia senco nur ĉe verboj sen daŭro. Kp. § 195.

Tempo-punkton difinas ankaŭ la tempaj tabel-adverboj: *tiam* (insiste: *ĝuste tiam*), *ĉiam*, *iam*, *neniam*. Anstataŭ ĉi *tiam* oni diras **nun**. La adverbo *iam* signas: en nedifinita tempo-punkto; la saman sencon havas ankaŭ **foje**. Ĉu tiu tempo-punkto estas preterita aŭ futura, tion montras sole la tempo de la predikato: *iam ni estis amikoj; mi esperas, ke iam mi rekompencos vian komplezon; foje estis reĝo; foje mi vizitos vin*.

Rim. III. Anstataŭ la preterita *iam* oni proponis *olim*, sed ĝi ne enradikiĝis, ĉar la tempo de la predikato preskaŭ ĉiam sufiĉe orientas pri la tempa pozicio de *iam*. Cetere, oni povas uzi ankaŭ **inte** kaj **onte**.

Rim. IV. *Iama* signifas ĉiam *iam estinta*.

2. *Relativa metodo*. Oni montras la tempopunkton per prepozicioj, malsamaj laŭ tio, ĉu la okazaĵo lokiĝas en la paseo aŭ en la futuro.

a) *paseo*; oni uzas **antaŭ**: *li alvenis antaŭ tri tagoj* (sed: *li alvenis tri tagojn antaŭ la edziĝo* – per la absoluta metodo); *antaŭ nelonge mi*

vizitis lin. Pri ĵus vd. § 218.

b) *futuro*; oni uzas **post**: *li foriros post tri tagoj* (sed: *ŝi mortis tri tagojn post sia malsaniĝo*); *post nelonge mi vizitos lin*.

Proksimuman tempopunkton per relativa metodo oni esprimas laŭ jenaj turnoĵoj:

aa) **p a s e o**: *tio okazis antaŭ ĉirkaŭ tri semajnoj, antaŭ pli longe ol (malpli longe ol) tri semajnoj*;

bb) **f u t u r o**: *mi revenos post ĉirkaŭ tri semajnoj, pli frue (pli malfrue) ol post tri semajnoj*.

II. La **daŭron** oni povas montri ankaŭ per akuzativo: *mi veturis du tagojn kaj unu nokton*; — aŭ per la prepozicioj **dum**, **tra**, **en**, **en la daŭro de**, **por**: *apetito venas dum la manĝado^z; la koko krias tra la tuta nokto^z; en la daŭro de kelke da minutoj mi aŭdis du pafojn^z; la Eternulo transdonis ilin en la manojn de la Filiŝtoj por kvardek jaroj^z; mi finos la tutan libron en kvar tagoj^z*.

Dum oni uzas, kiam la ago estas daŭra; **tra**, kiam la ago multfoje ripetigas dum la indikita daŭro; **por**, kiam oni indikas ne la daŭron de la ago, sed la daŭron de stato, kiu el ĝi sekvas (*li forveturis por* [forestos dum] *tri tagoj*); **en** indikas la tempon necesan por fari agon. Oni precipe atentu ne konfuzi **dum** kaj **en**: *li parolis dum kvin minutoj, sed neutile, ĉar tiajn demandojn oni ne povas respondi en kvin minutoj*.

Rim. V. Erare estas uzi **antaŭ** anstataŭ **en**. Do: *mi finos la tutan libron antaŭ kvar tagoj* estus nekorekta anst. *en kvar tagoj*; korekte ĝi povas signifi nur proksimuman tempo-punkton.

Senliman daŭron oni esprimas per **ĉiam**, **eterne**: *li estis ĉiam diligenta; mi amos vin eterne*. Se temas ne pri la senlimeco de la ago mem, sed pri la senlimeco de la stato, kiun ĝi estigas, oni antaŭmetas **por**: *notu tion por ĉiam; li forpasis por eterne*. Sed ĉe futura ago, oni kelkfoje uzas **por** ankaŭ pri la daŭro de la esprimita ago, por emfazo: *mi amos vin por eterne; desegnu tion en libro, por ke tio restu por la tempo estonta, por ĉiam, por eterne^z*.

Pri ankoraŭ vd. § 89.

Komencaj tempadjektoj

194

La komencaj tempadjektoj signas la komencon de daŭra predikata ago. La prepozicio estas **de**. Ĝi povas esti uzata:

a) kiam la ago-komencon montras tempo-punkto: *li laboras de la kvara matene; de nun^z; de tiam^z*; (absoluta metodo).

b) kiam la ago-komencon montras la komenco de daŭro: *jam de tri jaroj mi ne fermis okulon^z; tiel estis de eterne^z*; (relativa metodo).

Pro la multsignifeco de **de**, ofte estas oportune distingi la tempan **de** disde la alisignifaj. Tiaĉe Z. enkondukis **de post**, kaj Grabowski **ekde** (per unu vorto, ĉar **ek** estas ja prefikso!).

Rilate al tempo-punkto, **ekde** kaj **de post** estas samsignifaj: *de post lia*

morto estas egala al *ekde lia morto*. Sed se la temp-adjekto signas daŭron, la sencoj estas malsamaj: *ekde* signifas *de-komence de*, dum *de post* signifas *de-fine de*. Tiamaniere, *ekde lia morto* egalvaloras ankaŭ kun *de post lia vivo*; kaj *ekde tri jaroj* estas proksimume samsignifa kun *de antaŭ tri jaroj*. Diri do en tia senco *de post tri jaroj* estas malĝuste.

Ĉar *ekde* estas uzebla egale ĉe tempo-punkto kaj ĉe daŭr-komenco, estas oportune uzi ĝin ĉiam en ambaŭ okazoj kaj rezervi *de post* por la senco *de-fine de*; ekz-e: *de post la tri tagoj de via restado ĉe ni, mi ofte miras, kiel rapide forflugis tiu tempo*.

Proksimuman tempo-punkton oni povas esprimi per *de antaŭ*: *tiuj ostoj postrestis de antaŭ la diluvo*; *de ĉirkaŭ*: *mi laboras de ĉirkaŭ la oka*; dum *de post* ne estas tiel uzata, ĉar la lingv-uzo donis al ĝi la sencon de preciza signado de tempo-punkto. Tial oni devas sin helpi per *post* kun komenc-aspekta verbo: *mi eklaboros pri tiu temo nur post Kristnasko*.

Rim. Oni povas uzi, anstataŭ *ekde*, ankaŭ *jam* kun akuzativo: *mi jam tridek jarojn estas tombisto*². Sed tiu dirmaniero ne ĉiam estas tute klara, do malpli rekomendinda. Same la uzado de *de* sen alia precizigilo (*jam*, *post*, *ek-*) estas ofte konfuziva pro la troa multsignifeco de tiu prepozicio. Tamen, oni ne uzu ilin antaŭ *kiam*, *tiam*, *nun* ktp., do *kiam* la tempa senco estas evidenta. *De post kiam* aŭ *ekde nun* ktp. estas senutila vortplimultigo.

Pri *jam* vd. § 90.

Finaj tempadjektoj

La finaj temp-adjektoj signas la finon de daŭra predikata ago. Iia prepozicio estas ĝis: *mi ne forgesos vin ĝis via morto*²; *mi laboros pri tia tasko ĝis la fino de la monato*; *ĝismatene ili dancis*; *ĝis revido* (mi memoros vin); *ĝis tiam*; *ĝis nun*.

195

Ĝis povas kombiniĝi kun *antaŭ* kaj *post*, *kiam* la ago-finon montras la komenco aŭ fino de daŭro: *ĝis antaŭ kelkaj jaroj la japana popolo devis kaŝi sian vizaĝon, kiam la imperiestro preterpasis*; aŭ por montri proksimumecon (kp. § 193): *mi ripozos ĝis post Pasko*. Eĉ kun *ĉirkaŭ*: *ili drinkis ĝis ĉirkaŭ noktmezo*.

Rim. Se la predikato estas verbo sen daŭro, kompreneble ĝis ne povas signi finon de daŭro, sed nur tempo-punkton (kp. § 193, Rim. I.). Ĉe ripetitaj sendaŭraj agoj, aliflanke, oni devas signi la ripetadon per *-ad*, por eviti konfuzon kun la proksimuma signado de tempo-punkto: *mi sendados leterojn ĝis dimanĉo* (lunde mi jam ne sendos); *mi sendos ilin ĝis* (aŭ *por*) *dimanĉo* (unufoje, plej malfrue dimanĉe).

Pri *plu* vd. § 90.

Nombraj tempadjektoj

Al la temp-adjektoj apartenas ankaŭ la adjektoj, kiuj signas, en kiom da okazoj ripetigaĵas ia ago. Ili respondas je la demandoj: *kiomfoje*, *kiom da fojoj*, *kioman fojon*, *je kioma fojo*; ili estas esprimataj per la radiko *foj*: *legi libron unufoje*, *dufoje*, *kelkfoje*, *multfoje*; *ĉiufoje* (*ĉiun fojon*) ĉe

196

via alveno oni akceptos vin plezure; unu fojon por ĉiam²; la koko kriis trifoje (tri fojojn); la koko kriis je la tria fojo²; je la unua fojo²; por la lasta fojo²; solvi ĉion per unu fojo².

Foje signifas: unufoje en nedefinita tempo: *foje estis reĝo*. Por signi: pli-ol-unufoje en nedefinita tempo, oni uzu: **kelkfoje**, **plurfoje**. Vd. ankoraŭ § 87, C, Rim. II.

Rim. I. La diferenco inter **foje** kaj **iam** estas, ke **foje** (unufoje) povas signi nur unufojan agon (daŭran aŭ momentan), dum **iam** estas uzebla ankaŭ ĉe ripetito. Oni do ne diru: *foje mi ofte vizitis lin*, sed: *iam mi ofte vizitis lin*.

Rim. II. Por akcenti la sporadecon, Z. ofte uzas **iufoje** anstataŭ **kelkfoje**: *oni ja devas iufoje ion toleri²*. Sed **iufoje** ŝajnas havi alian senco: *iun fojon el certaj fojoj*. Ekz-e: *li multfoje falis de ĉevalo; iufoje eĉ rompis al si la kruron*. En la supra senco oni povas renkonti la uzadon de **foje-foje**: *foje-foje revenas la malnovaj revoj*.

LA STATAJ ADJEKTOJ

197

La stataj adjektoj karakterizas, helpe de la predikato, la staton de la subjekto, aŭ tiun de la objekto. Laŭ tio oni povas distingi stat-adjektojn subjektajn kaj objektajn.

A. La stat-adjektoj povas difini

1. la *situacion*, t.e. la aktualan staton de la objekto aŭ subjekto. Tiuj estas la *situaciaj adjektoj*. Ili povas esprimi:

a) *kun kio*, aŭ *sen* (apartigite de) *kio* okazas la ago de la subjekto aŭ pri la objekto (*societaj kaj separativaj adjektoj*).

b) *en kia stato* troviĝas la objekto aŭ la subjekto: tiuj estas la *statindikaj adjektoj*. Tiu stato povas influi la agon. Se ĝi influas ĝin favore, ni parolas pri *kondiĉaj adjektoj*; se ĝi influas ĝin malfavore, do la ago okazas *malgraŭ ĝi*, ni parolas pri *koncedaj adjektoj*.

2. la staton, *el kiu* la predikata ago devenigas la subjekton aŭ objekton (adjektoj *originaj*).

3. la staton, *en kiun* la predikata ago venigas la subjekton aŭ objekton (adjektoj *rezultaj*).

La objekton aŭ subjekton, al kiu la stata adjekto rilatas, oni nomas *rilatato*.

B. Ĉe pluraj specoj de la stataj adjektoj oni povas distingi du subspecojn.

aa) La adjekto esprimas la rilataton mem en ties tuto, kaj ties staton signas per sia speciala senco; ekz-e en la frazo: *ŝiaj haroj pendis en pezaj plektoj* – la vortoj "haroj" kaj "plektoj" signas la saman aferon. Tio estas la *subspeco identiga*.

bb) La adjekto esprimas cirkonstancon, en kiu troviĝas la rilatato. Ekz-e en la frazo: *li agis en granda kolero* – "li" kaj "kolero" ne estas identaj, inter ili ekzistas nur rilato. Tio estas la *subspeco rilatiga*.

Oni vidas, ke la stataj adjektoj rilatas, pere de la predikato, plie al la subjekto aŭ objekto ol al la ago mem (tio estas la ĉefa diferenco inter

ili kaj la adjektoj modalaj). Laŭ tio, do, la stataj adjektoj havas certan parencecon al la *predikativoj*. Vere, kelkaj predikativoj havas la sencon de stat-adjekto rezulta: *oni elektis lin prezidanto*; *ŝi lavis la veston pura*; ekzistas lingvoj, kiuj esprimas tiun formon ĉiam per prepozitiva rezult-adjekto. Same la funkcion de stat-adjekto povas havi vorto enkondukita per la "liganta vorto" kiel: *li havis nur la pugnojn kiel armilon* (nereкта predikativo); krome la adjekta predikativo, kiu povas esti adjektiva (Vd. § 170, 4): *ŝi dancas nuda* (ŝi dancas en nuda stato) kaj substantiva (Vd. § 200 A. c.): *li mortis mizerulo*.

La analogecon inter la predikativoj kaj stat-adjektoj montras ankaŭ tio, ke ĉe ambaŭ frazelementoj oni povas distingi subjektajn kaj objektajn.

Rim. La adjektan predikativon oni do povus klasi ankaŭ inter la stat-adjektoj, kiel ilian sesan formon (kp. § 170, Rim. II.): *adjekton predikativan*. De la adverba adjekto ĝi diferencas per tio, ke ĝi rilatas, pere de la predikato, al la subjekto, dum la adverba adjekto karakterizas la agon mem. Ofte tiu distingo ne estas nepre necesa, ĉar la agmaniero multfoje karakterizas ankaŭ la aganton mem: inter "*ŝi dancas nuda*" kaj "*ŝi dancas nude*" oni apenaŭ sentas diferencon, eĉ se teorie tia ekzistas. Sed en kelkaj okazoj oni *devas* uzi la adjektan predikativon, ĉar la adverba formo havas alian sencon: ekz-e, en *li iris sola tien*, *sola* karakterizas la aganton dum lia iro; male, en *li iris sole tien*, *sole* havas la sencon de **nur**. Per adjekta predikativo oni esprimas ankaŭ la unuecon: *la unua*; kaj la lastecon: *la lasta*. Komparu la jenajn frazojn:

Mi legis la unua la leteron (kaj poste ĝin legis aliaj).

Mi legis unue la leteron (kaj poste ion alian).

Mi legis la unuan leteron (sed ne la duan).

Mi legis unuafoje la leteron (ne duafoje).

Mi volis legi komence la leteron, sed poste mi ĝin flanken metis.

Situaciaj adjektoj

1. Societaj adjektoj.

Prepozicioj: **kun, kune kun, kompanie kun, asocie kun**: *venu kun mi²*; *la kuraĝo kreskas kune kun la danĝero²*; *li faris la negocon kompanie kun sia amiko*; *la azeno ĉasis asocie kun la leono* (subjektaj); *mi vidis ŝin kun granda hundo*; *li mangis viandon kun saŭco* (objektaj).

198

Kune kun signas insiste, ke la adjekto faras la saman agon aŭ estas trafata de la sama ago, samtempe, kiel la subjekto aŭ objekto: *la ŝipo dronis kune kun ĉiuj ŝipanoj* (subjekta); *li murdis la virinon kune kun ŝiaj du filinoj* (objekta).

Tie ĉi klasigas ankaŭ la duopaj prepozitivoj, kiuj esprimas efektivan kunecon: *li rajdis kun lanco en la mano*; *mi vidis ŝin kun stranga ĉapelo sur la kapo*. Kp. § 185.

Kondicionala predikato povas esprimi fiktivecon de la adjekto: *kun ŝi li vivus feliĉe* (se kun ŝi li vivus...).

Rim. I. Oni ne uzu akuzativon anstataŭ kun-prepozitivo esprimanta kunecon: *li venis lancon en la mano*, ĉar akuzativo ne povas montri kunecon. Kp. § 185.

Rim. II. Okaze la kunecon oni povas esprimi ankaŭ per aliaj prepozicioj: *homo*

199

apud homo tumultis en la koridoro; koro ĉe koro batis; malfeliĉo sur malfeliĉo^Z.

2. Separativaj adjektoj.

Per la komuna nomo: separativaj, oni povas signi adjektojn, kiuj montras iel apartigon disde la subjekto aŭ objekto. Apartigo oni povas rigardi la indikon de simpla manko (**sen, manke de**), la indikon de kompensata manko (**anstataŭ**), la specialan indikon de io ĉeestanta inter aliaj (inkluziveco: **krom, inkluzive de**), la specialan indikon de io ne ĉeestanta inter aliaj (ekskluziveco: **krom, ekster, ekskluzive de, escepte de**): *sen fajro ne brulas eĉ pajlo^Z; ne servas larmo anstataŭarmo^Z; la E-aj vortoj, krom kelkaj malmultaj, ne estas arbitre elpensitaj^Z; ekster tiaj okazoj li vivis sola* (subjektaj); *uzi prepozicion sen akuzativo^Z; li donis al mi konsilon anstataŭ helpo; mi diras al vi nenion alian krom plej pura vero^Z* (objektaj).

Rim. I. Anstataŭ la adverba *escepte* oni povas uzi **esceptokaze**, por eviti miskomprenon kun la prepoziciaja signifo. Pri infinitivo post separativaj prepozicioj vd. § 255, B.

Rim. II. Z. uzas kelkfoje **pro** en la senco de **anstataŭ**: *elporti la malnovan grenon pro la nova^Z; niaj infanoj loĝos en la urboj pro la nunaj loĝantoj^Z*. Tio, verŝajne kaŭzita de la latina, apenaŭ estis imitata.

Kaŭzo de la anstataŭigo estas eble ankaŭ la longeco de **anstataŭ**. De Saussure proponis mallongigon (*anstat*) kaj Z. en 1908 proponis *stete*, sed sensukcese. Eble oni povus utiligi la prefiksan sencan de *vic* (*vicprezidanto* = *prezidant-anstataŭanto*) kaj uzi *vic'al* analoge al *dank'al*: *manĝi terpomojn vic'al pano*. Tio povus esti bonvena precipe en poemoj, kie la trisilaba **anstataŭ** iafaĵe estas vera katastrofo.

Rim. III. **Krom** signas apartigon, same ekskluzivan kiel inkluzivan. Ekskluziva estas ĝia senco apud **negacio** (**ne, neniu, nenio**) kaj apud **ĉio, ĉiu**: *mi ne havas amikon krom vi; neniu krom vi povus tion fari; ĉiuj restu krom unu^Z; ni donas ĉion krom genio*. Per **krom** oni povas escepti ankaŭ parton el tuto (kiam oni povas subkompreni **tuta** aŭ **ĉiuj**): *via teksto (tuta) estas senerara krom unu frazo; mi perdis liajn leterojn (ĉiujn) krom unu; la popolamaso disiĝis krom malgranda grupo*. Post **neniu (nenio)** alia oni uzas **ol**: *mi diras al vi nenion alian ol la plej puran veron*. En aliaj okazoj la ekskluzivecon oni esprimas per **ekster** aŭ **escepte de**, kaj **krom** signas inkluzivecon, kiun oni certigas per **ankaŭ**. Same per **ankaŭ** oni montras la inkluzivecon post **ĉiu, ĉio**: *ofte oni perdas krom sia havo ankaŭ la amikon; krom Petro tie estis ankaŭ ĉiuj miaj fratoj*. Kelkfoje oni esprimas ĝin per **eĉ** aŭ **ankaŭ**: *ni donas ĉion, eĉ genion*. Post **alia** (sen **negacio**), **krom** signas inkluzivecon (kun **ankaŭ**): *mi uzos ankaŭ aliajn rimedojn krom tiu*. Komparu la ekskluzivan sencan de: *mi uzos aliajn rimedojn ol tiun*.

Kondicionalo montras la supozitecon, fiktivecon de la **sen**-adjekto: *sen via helpo mi ne estus povinta sukcesi* (mi ne estis sen via helpo, do mi sukcesis), indikativo montras ĝian faktecon: *sen via helpo mi ne povis sukcesi* (mi ne sukcesis pro manko de via helpo).

200

3. Statindikaj adjektoj.

A. Identiga subspeco.

a) Se la adjektsubstantivo montras la materialon de la rilatato, oni uzas **el**: *lia biblioteko konsistas el modernaj romanoj*.

b) Se ĝi montras la rilataton laŭ ties konsistigaj partoj, aŭ laŭ ties kvanto, aŭ laŭ ties tuteco, oni uzas **en**: *la neĝo falas en grandaj flokoj; en longaj girlandoj pendis mirindaj kreskaĵoj²; ŝiaj haroj estis kunvolvigitaj en pezaj plektoj² – li aĉetis librojn en granda nombro; la libro estis presita en 1000 ekzempleroj; – mendoj en la valoro de 100 frankoj; li venis en sia propra persono.*

c) Se la adjektsubstantivo simple, en sia tuto, estas identigata al la rilatato, por montri ĉi ties funkcion, staton, esencan kvaliton, destinitecon, oni uzas **kiel** (*kvalifika kiel*); *li venis kiel delegito; li vizitis ŝin kiel ŝvatiganto; Petro, kiel sekretario, tre multe laboris por la grupo* (subjektaj); *ni manĝis bombonojn kiel deserton; ili havis tendon kiel loĝejon; li alportis por la infano pupon kiel donacon* (objektaj). Krom tiu kvalifika aŭ *stata kiel*, ekzistas ankaŭ *rezulta kiel* (enkondukanta vorton, kiu signas la rezulton de la ago, vd. § 204), kaj *kondiĉa kiel* (enkondukanta vorton, kiu signas la kondiĉon de la ago, vd. § 201).

Rim. I. La identiga (stata, rezulta, kondiĉa) **kiel** estas nek subjunkcio, nek prepozicio, sed simple "liganta vorto". Subjunkcio ĝi ne estas, ĉar la frazelemento, kiun ĝi enkondukas, ne estas parto de kompletigebla elipsa propozicio; efektive tiaj kiel-esprimoj estas aŭ tute ne kompletigeblaj, aŭ, se oni kompletigas ilin, per tio la identiga senco ŝanĝiĝas en komparon (*li venis kiel delegito venas* = lia veno estas simila al tiu de delegito). Kaj prepozicio ĝi ne estas, ĉar la frazelemento, kiun ĝi enkondukas, devas stari en la sama kazo, kiel la rilatato: *kiel esperantistojn tia batalado ne povas nin tuŝi²; li propagandis kiel unua tiajn ideojn²*. (Kp. § 262).

Kiel do havas en Esp-o du funkciojn sence preskaŭ kontraŭajn: komparan kaj identigan. Kelkfoje oni bezonas distingi inter tiuj.

La komparan signifon oni povas nepri: a) per la kompletigo de la prop-a fragmento, ĉar, kiel ni vidis, la identigo ne toleras la kompletigon: *oni elektis lin, kiel reĝon oni elektas* (tiel solene); b) per kvazaŭ anstataŭ **kiel**, ĉar kvazaŭ signas fiktivan identecon, do similecon, komparon: *oni elektis lin, kvazaŭ reĝon* (vd. § 263).

La identigan signifon oni povas nepri ĉe objekta statadjekto per **por** anstataŭ **kiel**: *mi donas al vi la landon por eterna posedajo²; ĉe subjekta statadjekto per estante: li laboris penege, estante lignohakisto* (*kiel lignohakisto* ŝajnus komparo), aŭ per la "signo nula" de adjekta predikativo (vd. § 197): *al la feino kreskis flugiloj kaj ŝi forflugis birdo* (*kiel efektiva birdo; kiel birdo* ŝajnus komparo pri la facileco de ŝia flugo); *ŝi komencis sian karieron kiel cirka dancistino, kaj ŝi mortis Teodora, amata edzino de imperiestro* (*kiel Teodora* ŝajnus unuavide komparo). Kp. § 262.7.

Rim. II. Efektive mankas oportuna rimedo, uzebla en ĉiaj frazoj, esprimi la identecon: estus imageble tiri el la tabelo pluan vorton, kaj diri **estiel**, t.e. estkvalite (ne similkvalite!); oni tiel povus eviti ĉian konfuzon inter: *li mortis kiel kristano* (kvankam tia li ne estis) kaj: *li mortis estiel kristano* (ĉar tia li estis).

Rim. III. Per la identiga **kiel** neniam oni rilatigu al io reprezentita per poseda adjektivo. Do: *li multe helpis min en tasko mia kiel prezidanto* – estas malĝusta, se la prezidanto estas mi. Oni diru: *en mia tasko de prezidanto*.

d) La kiel-substantivo povas esti ne la identigato, sed la rilatato mem, tiel ke la identigato estas la ŝajna rilatato; tion oni povas nomi *inversa identigo*: *veraj danoj kiel ni*^Z = ni, kiel veraj danoj. Tie ĉi la senco de kiel proksimiĝas al tiu de **ekzemple**.

Tiaj formuloj estas uzataj

aa) por esprimi valorjuĝon (*taksa kiel*): *mi miras, ke lingvisto, kiel li, povas tiel erari* (li, tiel sperta, fama lingvisto); *lingvon, kiel Esperanto, oni ne povas neniigi* (Esperanton, kiel lingvon disvastiĝintan, multflanke ellaboritan); *lingva studo, kiel tiu de de Hoog, estas tre utila* (studo de de Hoog, kiel studo ĝisfunda, detala, klarvida ktp.);

bb) por esprimi la kategorion, al kiu la diritaj aĵoj apartenas (*ilustra kiel*): *personaj nomoj, kiel Julio aŭ Mario, povas esti kaj viraj kaj virinaj; adasismo, kiel kreadas-rigardadas, ne estas rimo*.

Rim. IV. Post la taksa kaj ilustra kiel, la substantivo estas ĉiam nominativa, eĉ se ĝia rilatato estas akuzativa: *verajn danojn, kiel ni* (kp.: nin, kiel verajn danojn). Tion oni povas klarigi dumaniere: aŭ tiel, ke post kiel oni elipsas *kia estas*; aŭ tiel, ke ĉe la taksa kiel oni subkomprenas la taksan adjektivon: *lingviston* (spertan) *kiel li*; *lingvon* (evoluintan) *kiel Esperanto*, kaj ĉe la ilustra kiel temas pri speco de nomesperimo: *personnomojn kiel Julio aŭ Mario* (kp. *la personnomojn Julio kaj Mario*). Vd. § 132, I.

B. Rilatiga subspeco.

a) se la stato estas cirkonstanco ekstera aŭ interna (anima), oni uzas *en*: *en via situacio mi ne hezitus*^Z; *vagi en granda mizero*; *la forto grandigas en premateco*^Z; *kien vi iras en tia izoleco*?^Z *agi en granda kolero, en konsento, en rapido*; *esti en danĝero, en bona humoro*; *ŝi veis en sia doloro*; *paroli en febro, en deliro*; *esti en dubo, konfuzo, embaraso, en marŝo, vojaĝo*; *la romano estas legebla en kvin lingvoj*; *sidi en vigla interparolado*^Z; *mi ekstermis la izraelidojn en mia severeco*^Z; *en ĉasado de damo*^Z; *esti en proksimo, en bona stato, en sano, en malespero, en ordo* (subjektaj); *havi iun en fido*; *danĝere estas lasi lin plu en tia libereco*^Z; *ŝi trovis la infanon en granda danĝero* (objektaj). Ĉe plurala adjekt-substantivo oni povas uzi *inter*: *inter tiaj cirkonstancoj*; *fari vojon inter danĝeroj*; *morti inter doloroj*; *li trovis ŝin inter larmoj*.

b) se la stato estas funkcio, oni uzas same *en*: *veni en akompano de iu*; *ludi fortepianon en akompano de kantistino*; *stari en ies servo*; *ludi en la rolo de reĝo Lear*; *en la funkcio de sekretario*.

c) kelkfoje oni trovas *sub*: *sub la formo de io aperi*; *sin prezenti sub la masko de...*; *pritrakti sub la titolo de...* Tion komprenigas la pli-malpli metafora uzo de *sub*.

d) se la adjekt-substantivo estas konsistiga parto, korpoparto de la rilatato kaj la staton esprimas ĝia komplemento, oni uzas *kun*: *kisi iun kun senhonta vizaĝo*; *demandi kun batanta koro*; *marŝi kun flanko ĉe flanko*^Z; *foriri kun longa nazo*^Z; *estas la sama afero, sed kun kapo al tero*^Z (subjektaj); *oni trovis lin kun rompita kapo*; *ne forsendu min kun malplenaj manoj* (objektaj). Pri akuzativo anstataŭ *kun* vd. § 185, Rim. III.

Kp. ankoraŭ § 187.

e) tie ĉi oni povas klasi ankaŭ la adjektan predikativon: *ŝi kantis nuda; li vagis mizera.*

Rim. V. Oni povas uzi anstataŭ stat-adjekto ankaŭ adverbos; tio eblas, eĉ kiam la adjekto estas objekta, do ne rilatas al la subjekto: *danĝere estas lasi lin libere; mi sendas la libron ĉi-kune.* La malpermeso ekzistas nur rilate al participoj (vd. § 158, Rim. I, kaj § 183, Rim. I.).

4. Kondiĉaj adjektoj.

Ili esprimas la staton de la subjekto aŭ objekto kaj samtempe ankaŭ tion, ke tiu stato influas la agon favore.

A. *Identiga subspeco*; la adjekton oni enkondukas per kiel: *oni petis lin, kiel prezidanton, ke li intervenu; la naturo elkraĉu min kiel ekstermin-dan beston²* (objekta); *vi, kiel sekretario, povas facile aranĝi la aferon* (subjekta).

Rim. I. Por neprigi la kondiĉan sencon, oni metu la kiel-adjekton senpere post la rilatato. Pri la kazo post kiel vd. § 200, Rim. I.

B. *Rilatiga subspeco*; oni uzas la prepozicion ĉe.* Per tiu ĉi subspeco oni povas indiki:

a) la simplan ekziston de io ekstera, kiu influas la agon per sia ekzisto: *ĉe ekzistado de lingvo internacia ĉiuj tradukoj estus farataj nur en tiun ĉi lastan²; ĉe la leĝo de internacieco granda arbitro en la elekto de vortoj ekzisti ne povas².*

b) la konstantan, esencan kvaliton de la subjekto aŭ objekto: *ĉe lia lerteco, oni povas konfidi al li la taskon; ĉe tiaj kapabloj, li certe faros brilan karieron.*

Rim. II. Se temas pri kvalito okaza, ekzistanta nur dum la ago, oni uzas kun: *paroli kun elokventeco* (kp. *ĉe via elokventeco, vi certe konvinkos lin*). Sed tiajn kun-adjektojn, rilatantajn strikte al la ago, oni devas klasi inter la manieraj.

5. Koncedaj adjektoj.

A. *Identiga subspeco*; ĝi estas esprimebla nur per konceda subprop-o: *mi amas lin, kvankam li estas sentaŭgulo.* Sed kelkfoje oni trovas elipsan subprop-on: *mia amiko, kvankam klubano, neniam venas en la kunvenojn.* Analoge al kiel, oni povas uzi *kvankam* ankaŭ por signi objektan adjekton; tiaokaze ĝi estas kvazaŭadverbo kaj ĝin sekvas akuzativo: *min, kvankam komitatanon, oni eĉ ne demandis.* Sed tio estas iom nekutima.

B. *Rilatiga subspeco*; oni uzas:

a) la prepozicion ĉe, kiam la adjekto estas posedaĵo, kvalito aŭ ago de la rilatato, aŭ kiam la adjekto kaj la rilatato havas saman posedanton:

* Nur kiel interesaĵon ni mencias, ke al ĉi tiu senco de ĉe plene respondus la prepozicio **graŭ**, kiun tamen oni uzas nur kun *mal-* (**malgraŭ**) en la kontraŭa (konceda) senco.

ofte ĉe vesto velura doloras stomako^z; ĉe mia plej bona volo mi ne povas alkitimiĝi^z; ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincero^z; ni trenas kiel bovoj kaj ĉe tio ni deklamas pri sendependeco^z.

b) la prepozicion **malgraŭ**, kiam temas pri ekstera cirkonstanco: *ni pacience eltenis malgraŭ la multaj atakoj^z; malgraŭ viaj petegoj, li ne estus vin pardoninta.*

c) la prepoziciaĵon **spite de** (al, -n) ĉe intenca, obstina malgraŭeco: *spite ĉiujn argumentojn li rifuzis.* Oni ne trouzu **spite** anstataŭ **malgraŭ**. Pri nominativo post **spite** vd. § 92, Rim. VI.

Rim. Ĉe la situaciaj adjektoj kondicionala predikato montras la fiktivecon de la adjekto. Ekz-e, en la unua ekzemplo sub § 201, B. a), la kondicionalo montras, ke lingvo internacia ankoraŭ ne ekzistas; en la lasta ekz-o sub § 202, B. b) (*malgraŭ viaj petegoj*) la kondicionalo montras, ke la petego ne okazis.

Sola escepto estas ĉe la kondicionaloj *estus devinta, povinta, volinta, dezirinta*, kiam ili esprimas la faktecon de devo, povo, volo, deziro, sed la neobeono de devo, neuzo de povo, neplenumo de volo aŭ deziro; tiam la adjekto estas fakta: *ĉe tiaj kapabloj li estus povinta fari brilan karieron* (la kapabloj estas faktaj); *en tia mizero li devus pli multe klopodi por sin helpi* (la mizero estas fakta); *malgraŭ la multaj atakoj li estus volinta elteni, sed...* (la atakoj estas faktaj).

Pri particip-adverbaj kondiĉaj kaj koncedaj adjektoj vd. § 118 kaj 183, II.

Originaj adjektoj

203

La originaj adjektoj esprimas la antaŭan, jam ŝanĝitan staton de la objekto aŭ subjekto. Ilia prepozicio estas **el**.

A. *Identiga subspeco: ĉio fariĝis el polvo; fari el Danujo malliberejon^z; kio fariĝis el vi? el la neceseco oni devas fari virton; el nenio oni povas fari nenion; forĝi el glavo plugilon^z.*

B. *Rilatiga subspeco: deveni el nobela gento; la monumento devenas el la antikva tempo; traduki el la angla lingvo; vekti el dormo; eliri el embaraso; esti skuita el siaj revoj^z; forpuŝi iun el la societo; malaperi el la komerco; levi sin el malestiminda situacio^z.*

Rezultaj adjektoj

204

La rezultaj adjektoj esprimas la staton estiĝintan per la predikata ago.

A. *Identiga subspeco.* Ĉi tie oni trovas kvar okazojn:

a) Se la adjekt-substantivo esprimas funkciulon, profesiulon, la rezultadjekto devas esti esprimata per predikativo rekta aŭ nereкта: *nomumi iun instruisto; elekti iun prezidanto aŭ nomumi iun kiel instruiston; elekti iun kiel prezidanton.* La rekta predikativo estas preferinda, ĉar ĝi malebligas la komparan sencon.

b) Se la statŝanĝon esprimas la verboj **iĝi, fariĝi**, oni povas uzi nur rektan predikativon: *li fariĝis sekretario; la edzino de Lot iĝis sal-statuo.*

c) Se la statŝanĝon esprimas la verboj **ŝanĝiĝi, aliformiĝi**, oni povas uzi ankaŭ rektan predikativon: *la feino ŝanĝiĝis floro*, sed pli kutime estas uzi la prepozicion **en**: *la feino ŝanĝiĝis en floron; lia malkaŝemeco ali-*

formiĝis en arogantecon^z.

d) Ĉe aliaj verboj, kaj precipe, se la adjekto esprimas dispartiĝon, oni devas uzi ĉiam la prepozicion en: *organizi nomadan popolon en ŝtaton; disrompi vazon en mil pecojn*. Pri la adjektiva rezultadjekto, vd. § 197.

Rim. Oni trovas kelkfoje ankaŭ prepoziciojn al kaj je: *la pozon duonkuŝan ŝanĝi je pozo sida*^z; *disrompi al mil pecoj*^z.

B. *Rilatiga subspeco*. Oni uzas la prepozicion en: *puntoj kaj bantrozetoj kuniĝis en mirinde bonordigita senordeco*^z; *profundiĝi en legadon*^z; *luli en dormon; puŝi iun en malfeliĉon*.

LA MODALAJ ADJEKTOJ

Dum la stataj adjektoj karakterizas, helpe de la predikato, la subjekton aŭ objekton de la ago, la modalaj adjektoj karakterizas la agon mem, montrante, *kiel, pro kio* aŭ *por kio* okazas la ago. Laŭ tio oni distingas adjektojn manierajn, kaŭzajn kaj celajn.

205

Manieraj adjektoj

Ili montras la manieron de la ago. Oni distingas inter la manieradjektoj la sekvantajn:

1. Adjektoj manier-indikaj.

Ili montras simple la manieron de la ago. Plej ofta formo estas la adverbo: *kuraĝe respondi; leone batali; kure sekvi; sence paroli; parkere lerni; hazarde trovi; ĉiujare kunveni; funde scii; tutmonde okazi; unuavide rekoni; iri mane-piede; paroli kvinlingve*. Sed ili estas esprimeblaj ankaŭ per prepozicio:

a) se en la adverba kunmeto ekzistas prepozicio, ĝi povas memstariĝi formante prepozitivan: *paroli sen senco*.

b) se en la adverbo ne ekzistas prepozicio, oni uzas: **kun**, por aldoni ian pli-malpli flankan, do forigeblan cirkonstancon: *fermi pordon kun bruo; vendi ion kun perdo; preni ion kun malkonfido*^z; *batali kun kuraĝo; lerni kun fervoro; paroli kun elokventeco*. Cetere oni uzas en: *malfermi en plena larĝo*^z; *tremi en la tuta korpo; neĝi en grandaj flokoj; veni en sia propra persono; paroli en la germana lingvo, en kvin lingvoj; uzi vorton en alia senco ol la oficiala; iri en la direkto de...; marŝi en takto; paroli en versoj; en la plej alta grado; en la nomo de la societo; paroli en sekreto; tio ekzistas nur en fabelo; paroli en alia maniero*^z; *pensi en si mem; tremi en ĉiu fibro*. **Sub**: *aperi sub alia formo*. Kiel oni vidas, oni uzas **kun**, kiam por la malo oni uzus **sen**: *fermi la pordon sen bruo*. Se tio ne estas ebla, oni uzu **en**.

c) se la adjekt-substantivo indikas rimedon, kvaliton, instrumenton, korpoparton, helpe de kiu la ago okazas, kaj la manieron de la ago montras la epiteto aŭ suplemento de tiu substantivo, oni uzas **per**: *tremi per la tuta korpo; ekkrii per terura voĉo; trafi du celojn per unu ŝtono*^z; *veni per kurba vojo al rekta celo*^z; *eltrinki per unu tiro*^z; *timi la kole-*

ron, per kiu la Eternulo ekkoleris; vivi per mizera vivo^z; ne paroli eĉ per unu vorto^z; esti bela per beleco de anĝeloj^z; stari per unu piedo en la tombo^z; sin preterŝovi per paŝo majesta^z; atingi ĉion per unu fojo^z; marŝi per piedoj nudaj; filo tute fremda per la koro^z; rubandeto brilis per roza koloro^z; vivi per unu animo en du korpoj.

d) tie ĉi klasiĝas granda parto de la interpozitivaj: stari vizaĝo kontraŭ vizaĝo^z; iri ŝultro ĉe ŝultro, flanko ĉe flanko; ekzameni ion punkto post punkto; atingi la celon paŝo post paŝo^z.

e) tie ĉi klasiĝas la adjektoj lokaj-manieraj, kiuj esprimas la direkton de la ago: rigardi el la brakoj de la polipoj^z; kribi el sia mizero^z; paroli el balkono; paroli el mezo de fajro^z; rigardi en la ĉambron; legi el libro; trinki el glaso. Ili estas tute similaj al la lokadjektoj movaj, la diferenco estas nur en ilia metaforeco de la verboago.

f) inter la manieraj adjektoj oni povas fine klasi la konform-adjektojn, kies prepozicio estas laŭ, kaj kiuj indikas ion, al kio konforme, adaptiĝante, obeante okazas la ago: aranĝi laŭ alfabeto ordo; fali laŭ sia tuta longeco^z; laŭ tio, kiel oni ĝin prenas^z; mi venis laŭ via ordono; laŭ la regularo tio estas malpermesata; agi laŭ sia kapo, konscienco, plaĉo, bontrovo; ripeti ĉion vorto laŭ vorto^z; iri laŭ fremdaj postsignoj^z; decidi laŭ la okazontaĵoj^z; juĝi laŭ ekstero^z; fari ion laŭ modelo^z; kopii ion laŭ la originala manuskripto; trakti iun laŭ ties merito^z; respondi al malsaĝulo laŭ lia malsaĝeco^z; mezuri sian veston laŭ sia mono^z; kanti laŭ sia beko^z; danci laŭ ies fajfilo^z; laŭ la krio de la koko la spiritoj rapidas hejmen^z.

Rim. Kiam la senco estas "obeante al", la laŭ-adjekto estas sence proksima al kaŭz-adjekto. Precipe bone montras tion la lasta ekzemplo (laŭ la krio de la koko...).

g) la similecon de la ago al la ago de alia oni esprimas per kiel aŭ kvazaŭ: ami kiel frato; konduti kvazaŭ bruto. Sed tiuj estas rigardeblaj kiel elipsaj komparaj prop-oj (vd. § 262).

206

2. Adjektoj instrument-indikaj:

A. La ĝenerala prepozicio estas per. Per ĝi oni signas:

a) la ilon, kiun oni uzas por fari agon: bati per martelo; fosi per ŝpato; iri per lambastono; la korpoparton aŭ sentorganon: ni vidas per la okuloj kaj flaras per la nazo; minaci per pugno^z.

Rim. I. Ies tenatan korpoparton same oni signis kelkfoje per per: konduki iun per la nazo (B). Sed, ĉar tiel povas esti dube, ĉu ne temas pri la tenanta korpoparto, oni uzis ĉe: konduki ĉe la nazo^z; li kaptis Schweizeron ĉe la kolo^z. Sed, ĉar ĉe povus signifi ankaŭ apud, tio ne estis kontentiga, kaj Zamenhof fine uzadis je por la tenata korpoparto, kontraste al per por la tenanta (kiel rimarkigis sro Kenji Ossaka): subite ŝi ekkaptis per ambaŭ (= per s i a j) manoj du belajn florojn ĉe sia flanko^z; poste ŝi prenis Gerdan je la (= je ŝ i a) mano^z; ŝi eksentis, ke oni tenis ŝin je la (= ŝ i a) brako^z; sed ni orde kondukas ilin je la nazo^z; ŝi tenis la kolombon je la piedoj^z. Tiel oni povas tute klare distingi: ŝi falis, sed ekkaptis min per la manoj je la piedo.

b) ĉion, kion oni povas rigardi kiel rimedon por atingo de celo, efektivego de ago: *per kio vi vivas? trafi per parolo rekte en la vizaĝon^Z; kompreni per helpo de vortaro; servo kvitiĝas per reservo^Z; eldevigi permezon per senĉesa ripetado; turmenti iun per malsato^Z; veti per mono; per kio la veto^Z; ekkoni iun per sinteno^Z, per la nazo^Z; tio okazis per si mem (sen ekstera influo); penetri en la domon per forto; konatiĝi per hazardo.*

c) la personon, kiun oni uzas por efektivego de ago: *sendi leteron per servisto* (subkomprenata adjekta ago: oni *sendis*, la servisto *portis*); same, ĉe parto de la faktitivaj verboj: *ŝi pentrigis sian portreton per fama artisto* (ŝi *pentrigis*, li *pentris*). Vd. § 119, C.

Rim. II. Ĉe alia parto de la faktitivaj verboj oni uzas **al**: *sciigi, trinkigi, havigi, perdigi al iu ion*. Klarigon kaj distingon vd. § 119, C.

d) ĉe la *medialaj* verboj la influanton de la ago oni povas rigardi kiel instrument-adjekton kaj signi per **per**: *ne ĉiam per ago mezuriĝas saĝo^Z; la pordo fermiĝis per la vento; la pupiloj malsekiĝis per larmoj^Z; la vizaĝo kovriĝis per honto^Z; la adjektivo finiĝas per -a^Z; la ŝtono ruliĝas per si mem*. Sed oni povas ĝin rigardi ankaŭ kaŭzo kaj uzi **de** (vd. § 208, I.).

B. En specialaj okazoj oni povas signi la instrument-adjekton ankaŭ per aliaj prepozici(aĵ)oj.

aa) Per **el**: *desegni el la memoro; diveni ion el la antaŭsignoj; krei el la tuta gorĝo^Z; ami el la tuta koro^Z; profiti el io; konkludi el io; legi ion el la okuloj; paroli el sperto; sciigi pri io el la gazeto; vivi el ŝparita mono; el tio oni vidas, ke...; per sub: tio estas malpermesita sub severa puno; sub ĉi tiu signo vi venkos; kompreni ion sub io; per laŭ: ekkoni arbon laŭ fruktoj; per sur: kalkuli sur fingroj; ludi sur violono; per kun: kun la tempo la formo nova elpuŝos la malnovan^Z. En ĉi tiuj okazoj la metaforaj subsencoj kaj la kromsencoj komprenigas la uzon de alia prepozicio.*

Rim. III. La lasta ekz-o estas la sola okazo, kie **kun** estas uzebla ĉe instrument-adjekto. Ĉe Z. oni trovas kelkfoje tiajn instrument-adjektajn **kun**: *gimnastiki kun laĉo; mezuri aliajn kun sia mezurilo*; ili ŝajnas plumeraroj. Sed oni tamen povas pravigi **kun**, se la adjekto ne devas esti nepre instrumento de la ago: *persekuti iun kun glavo^Z* (tenante la glavon en la mano).

bb) **Pere de** oni uzas, se la verbo esprimas aŭ subkomprenigas agon inter du personoj: *fari negocon pere de agente; geedziĝi pere de gazetanonco, svatisto*.

cc) **Dank' al** oni uzas, se temas pri favora influo rilate al la ago: *sukcesi dank' al ies helpo*.

dd) **Helpe de** oni uzas, se temas pri kunlaboro aŭ pri sistemo, kiun oni ne uzas plene, sed el kiu oni nur profitas: *li aranĝis la festenon helpe de tri klubanoj; instrui helpe de la Ĉe-metodo* (kp. laŭ la Ĉe-metodo).

ee) Ofte oni povas esprimi la instrument-adjekton per adverbo: *informi letere; bati martele; vidi sonĝe; mortigi pafe*.

Rim. IV. La aĉet-prezo, kiu estas propre rimedo por akiri la aĉetotan objekton, estas esprimata tamen ne per **per**, sed per **por** (vd. § 209, 2.).

C. Speciala okazo estas la *privokado*, kiam oni kvazaŭ vokas por helpo aŭtoritaton, por subteni sian diron. La privokiton oni povas signi per **per**: *peti iun per la ĉielo^z, per la rajtoj de lerneja amikeco^z*. Sed oni povas rigardi tiajn adjektojn ankaŭ motivaj kaj enkonduki per **pro** (vd. § 208, Rim. IV.).

207

3. Adjektoj mezurindikaj.

A. Oni esprimas la mezurindikajn adjektojn per la akuzativa formo: *li kuris tridek kilometrojn^z; ĝi kostas sepdek frankojn; mi estis nur tri paŝojn de la sojlo; ŝi kolektis de ĝi kolocintojn, plenan sian robon^z*; kelkfoje per **per**: *la memoro de granda homo per duonjaro supervivos lian morton^z; prokrasti per unu jaro; malfrui per dek minutoj; verŝi larmojn kvazaŭ per riveroj^z; per alteco de unu kalkanumo vi pliproksimiĝis al la ĉielo^z; alproksimiĝi per unu paŝo al la tombo^z*. Oni trovas ankaŭ **je**: *esti je unu jaro pli juna^z; je duono de kapo pli alta^z*; (vd. § 71, Rim. I.), precipe se la adjekto esprimas distancon kiel rezulton de movo: *retiriĝi je kelke da paŝoj (per kelkaj paŝoj esprimus la mezuron same kiel la manieron de la movo)*.

Rim. I. Oni ne uzu mezur-adjekton, kiam la mezurvorto estas senpere ligita al la mezurata subjekto per "estas"; tiam temas pri predikativo (nominativa): *la alteco estas tri metroj* (ne: *metrojn*). Sed: *la muro estas tri metrojn alta* (vd. § 144, a.).

Aliaj prepozicioj: **en**: *en la distanco de 5 mejloj; la akvo bolas en la temperaturo de 100 gradoj centezimalaj*, **ĝis**: *persisti ĝis ekstremo; la prezo plialtiĝis ĝis 5 frankoj*.

Oni notu la rekomendon de la Akademio (1974): "La Akademio mal-konsilas la uzadon de la prepozicio **po**, por esprimi la rilaton indikitan per la frakci-streketo en esprimoj kiel: *30 km/h* kaj similaj, kiel rektan eraron kontraŭ la ĝusta signifo de tiu prepozicio, difinita de Zamenhof en unu 'Lingva Respondo'.

Manke de specifa prepozicio por tiu uzado, la Akademio lasas liberecon al fakuloj elekti inter la prepozicioj **en**, **je**, **por** aŭ **sur** laŭ la cirkonstancoj, aŭ uzi adverbajn formojn, kiel *30 kilometroj hore*."

Mezuron esprimas ankaŭ la duopaj prepozitivaj: *de rando al rando; de kapo ĝis piedoj; de mateno ĝis vespero*.

Rim. II. Tie ĉi ni povas mencii ankaŭ la esprimojn de proksimumeco: **proksimume**, **ĉirkaŭ** (= iom pli aŭ malpli); **super** (iom pli); **ĝis** (eble iom malpli; aŭ, inter du numeraloj: iu el la du, aŭ iu el la internaj nombroj); **inter** (antaŭ du numeraloj: unu el la internaj nombroj): *li havas ĉirkaŭ mil frankojn; mi vidis tie super cent ĉevalojn; ili povas enteni ĝis kvar homojn^z; li povis kuŝi ok ĝis naŭ jarojn^z; ĉeestis inter kvardek kaj kvindek personoj*. Pri la akuzativo post tiuj ĉi prepozicioj vd. § 87, A.

B. Al la mezurindikaj adjektoj apartenas ankaŭ la *distribua adjekto* enkondukata per **po** (vd. § 87, F. kaj 133, I.).

Ĉe la adjekta distribuo oni distingas kvar okazojn.

1. Oni signas la distribuon per numeralo. Tio okazas, kiam la tutan distribuon kvanton signas la pluralo de ties elementoj: *la gastoj venis po tri; oni vendas tiujn cigaredojn nur po cent.*

2. Oni signas la distribuon per nombro de elementoj. Tio okazas, kiam la tuta kvanto estas esprimita per kolektiva nomo (ekz-e biblioteko, mono, speco ktp.) kaj la partoj per ties elementoj (ekz-e: libro, centimoj, pecoj ktp.): *li kunŝtelis sian bibliotekon po libro; oni kolektis la monon po kvin centimoj; tiun specon de cigaredo oni vendas nur po dudek pecoj.*

3. Oni signas la distribuon per mezurvorto. Tio okazas, kiam la tuta kvanto estas esprimita per nomo de materialo, kaj la partoj per vorto havanta pli-malpli la signifon de mezuro (ekz-e: kilogramo, litro, barelo, glaso, skatolo, grupo ktp.). Tiaokaze la nomo de la materialo devus esti esprimata post la mezurvorto, sed regule ĝi estas subkomprenata: *vendi cigaredojn po skatolo* (sk. da cigaredoj); *enpaki alumetojn po dek skatoloj; mi ĉiam aĉetas la vinon po dek boteloj; vendi pogrande², pomalgrande; verŝi vinon po guto; la gastoj venis po grupo; distranĉi drapon po tri metroj* (sk. da drapo). Kiel oni vidas, la numeralon **unu** oni tiaokaze ellasas post **po**, kaj **po** estas uzebla ankaŭ prefikse kun adverbigoj: *pogute, pogrupe, poskatole, pobotele, pobarele*; same: *poiom, poiome.*

4. Povas troviĝi tia situacio, ke la elementoj de ia tutaj grupo estas arigitaj en egalajn grupojn, kaj oni devas esprimi, kiom da elementoj rilatas aŭ koncernas ĉiun el tiuj grupoj. Ekz-e soldatoj (tutaj grupoj) grupiĝas en vicojn (grupo), kaj oni devas montri, kiom da soldatoj (elementoj) estas en ĉiu vico. Tiam la nombron de la elementoj oni esprimas per **po** plus numeralo, kaj la nomon de la grupoj oni enkondukas per iu prepozicio: *aranĝu ilin en vicoj, po ses en vico²; mi prenos vin po unu el urbo kaj po du el tribo²; li devis fari laboron po dekdu horoj en tago* (la laboro dividiĝas en tagojn, kaj 12 horoj distingiĝas el la horoj de ĉiu tago); *oni vendas tiujn cigaredojn nur po dudek pecoj por skatolo.* Ankaŭ la prezo, la kosto estas esprimebla tiamaniere: *mi fumadis cigaredojn po 20 rubloj por cento²; ŝi ricevis lecionojn po 20 spesmiloj por horo².* Kiel oni vidas el la ekzemploj, la nomon de la grupo oni ĉiam esprimas singularare; eventualan numeralon oni substantivigas: *en la komitato la membroj estas reprezentataj po kvin el cento.* Kp. tamen § 133, I. Rim.

Kaŭzaj adjektoj

La kaŭzaj adjektoj esprimas la kaŭzon aŭ la motivon de la ago. Ilia ĝenerala prepozicio estas **pro**. Oni povas distingi la sekvantajn okazojn:

1. la subjekto agas kvazaŭ pasive, sen propra iniciato; tio estas la adjekto *okaziga*. Oni uzas **de**: *svarmi de homoj; sveni de teruro²; tremi de malvarmo²; morti de malsato²; konsumiĝi de doloro²; de kantado senpaga doloras la gorgo²; ebriiĝi de vino²; la tero pleniĝis de mal-*

justaĵoj²; satiĝi de vidado²; vekigi de bruo²; ruĝigi de honto². Kp. § 206, A. d.

Tamen **pro** estas uzebla ankaŭ en la okazo de ekstera kaŭzo, ĉar ĝi estas ja la ĝenerala prepozicio kaŭza: *la loĝanto de tia lando pro manko de tiu vorto estas devigata nomi...²; liaj okuloj ĉesis funkcii pro maljuneco²; la 200 viroj, kiuj pro laceco ne povis sekvi Davidon...²; tiuj senfortiĝas nun pro malsato²; niaj ŝuoj malnoviĝis pro la tre longa vojo²; pro multo da arboj li arbaron ne vidas²; ŝrankon tute nigran pro maljuneco². En ĉi tiuj ekzemploj **pro** plejparte anstataŭas la pezajn sekve de, kaŭze de. Oni uzas **pro** precipe tiam, kiam la kaŭzadjekto havas desuplementon: *ruĝigi pro la honto de sia mizero².**

Rim. I. Tie ĉi klasiĝas la adjekto esprimanta la aganton de ago prezentita sub pasiva formo: ĝin oni esprimas ĉiam per la prepozicio de: *li estis mortigita de neniu².* Oni ne devas konfuzi tiun adjekton de aganto kun la instrument-adjekto, esprimita per la prepozicio per: tiun ĉi oni povas uzi nur, se la tiel enkondukita vorto ne estus prezentata kiel la subjekto de la ago, se oni esprimus ĝin aktive; ekz-e oni diras: *la tero estas kovrita de neĝo* (ĉar aktive oni ne povus diri: iu kovris la teron per neĝo); sed oni diros: *la tablo estas kovrita per tapiŝo* (ĉar aktive oni povas diri: mi kovris la tablon per tapiŝo). Same: *tiu vorto estas determinata per la artikolo* (ĉar oni povas diri: *la parolanto determinis tiun vorton per la artikolo*). Kp. ankaŭ § 110, Rim. IV kaj § 211.

2. la subjekto agas okaze de la kaŭzo, laŭ propra iniciato kaj libera decido; tio estas la adjekto *motiva*. Oni uzas **pro**: *venĝi al iu pro io; veni pro serioza afero²; okulon pro okulo, denton pro dento²; li amas ŝin pro ŝia beleco²; pro kio ŝi ploras?² morti pro la patrujo²; trinki pro ies sano²; mi ridas pro lia naiveco²; mi timas pro la urbo²; akuzi iun pro murdo.*

Rim. II. En la tri lastaj ekzemploj la adjekton oni povas rigardi ankaŭ traktativa kaj uzi **pri**: *pri la urbo; pri murdo*. Tio estas eĉ preferinda.

Rim. III. La kaŭzo kelkfoje estas malfacile distingebla de la celo. Ekz-e Z. skribas: *fosi pro akvo*, ĉar vere la akvo estis motivo por fosado, sed oni prefere rigardas ĝin ĉikaze celo (*por akvo*). Same: oni povas diri: *morti por la patrujo*, se oni volas akcenti, ke la bono de la patrujo estis la celo de la sinofero. La distingo aperas klare en jena frazo: *por vi kaj por mi. pro pano, pro azilo, pro trankvileco mi laboros!²*

Rim. IV. Ankaŭ la aŭtoritaton, kiun oni privokas en sia intereso, oni povas rigardi motivo kaj uzi **pro** antaŭ ĝi: *restu, pro Dio²; pro la ĉielo²; pro la diablo²; pro Patriko sankta². Kp. § 206, C.*

3. la adjekto ne nur motivas la agon, sed samtempe ankaŭ instigas por ties efektivigo: *instiga* adjekto. Tion oni povas esprimi per **el**: *fari ion el ia kaŭzo²; el malĝojo; el singardo; el principo; el amo; tio okazis el neceseco, ne el kaprico²; el tio rezultas, ke²; la akuzativo estas enkondukita nur el neceso²; unuj el la aŭtoroj komencas sian laboron el simpla facilanimeco aŭ el gloramo...²*

4. la adjekto ne nur instigas, sed rekte devigas la aganton por la respektiva faro: *deviga* adjekto. Oni uzas **laŭ**: *mi estas tie ĉi laŭ la ordono de*

*mia estro^Z; laŭ la kokokrio la spiritoj malaperis^Z. Ankoraŭ pli draste esprimas tion sub: *agi sub influo, impresio, ordono; skribi sub diktado^Z; fari ion sub ia kondiĉo.**

Rim. V. Pri la esprimo de prezo vd. § 209, Rim. II.

Ĉe sent-esprimaj verboj la kaŭzon oni ofte esprimas per infinitivo: *mi ĝojas vin vidi^Z; mi fieras tion aŭdi; ne fieru havi tian kutimon.* Sed tiun infinitivon pli ĝuste estas rigardi nerektobjekta (vd. § 182).

Celaj adjektoj

La celaj adjektoj esprimas la celon de la ago. Ilia ĝenerala prepozicio estas **por**. Per celadjekto estas esprimata:

209

1. Tio (ago, stato, ideo), kies efektivigon celas la predikata ago: *por kia celo^Z; vojaĝi por plezuro; diri ion por ies laŭdo; fari ion por ies honoro, malhonoro; mi klarigos, por kio ni kunvenas^Z; labori por esperantismo^Z; labori por komuna utilo.*

Rim. I. Se la ago celas efektivigon de ago kaj la subjekto de la du agoj estas identa, oni plejofte uzas infinitivan adjekton: *preni plumon por skribi; li estis invitita por kanti.* Sed ĉe neidentaj subjektoj tio ne estas aprobinda; tiam oni uzas aŭ verbosubstantivon: *pledi por la akcepto de la propono;* aŭ infinitivon sen **por**: *doni al iu manĝi^Z; sendi iun promeni.* Pri la absoluta **por** vd. § 268.

2. Tio, kies akiron celas la predikata ago: *riski sian vivon por duba rezultato^Z; por kio vi venis al mi?^Z labori por malgranda salajro; etendi la manon por almozo; erari por sia bono.*

Rim. II. Ĉi tie klasiĝas ankaŭ la adjekto esprimanta vendprezon, ĉar la vendo ja celas la akiron de la prezo: *vendi la domon por kvin mil frankoj;* kaj la adjekto esprimanta la aĉetobjekton, kies akiron ja celas la aĉeto: *pagi cent frankojn por la vesto.*

Male, la adjekto esprimanta aĉet-prezon propre estas instrument-adjekto, ĉar la mono estas ja rimedo por akiro: logike do oni devus diri: *aĉeti domon per kvin mil frankoj.* La adjekto esprimanta vend-objekton, siavice, estas kaŭz-adjekto, ĉar la vendobjekto estas kaŭzo ricevi monon; oni do devus diri: *ricevi cent frankojn pro la vesto.* Kaj vere tiujn prepoziciojn oni uzas, kiam la adjekto estas abstraktaĵo: *ĉiujn ĉi bienojn li aĉetis per la heredaĵo de sia patro; li ricevis du mil markojn pro la perfido al sia amiko.*

Tamen, ĝenerale, pro analogio kaj simpleco, la lingvuzo ne faras subtilajn distingojn kaj ĉe ĉiuj adjektoj rilatantaj al vendo aŭ aĉeto ĝi aplikas unuece la prepozicion **por**, kaj same ĝi procedas en ĉiuj okazoj, kiam temas pri interŝanĝo. Oni do povas konstati la regulon, ke la *interŝanĝ-adjekto* estas esprimata per **por**: *vendi, aĉeti teon por unu franko^Z; pagi, ricevi cent frankojn por la vesto; tiu drapo kostas po dek frankojn por metro; por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn^Z; pagas maljunaj jaroj por junaj eraroj^Z; rekompenci iun por la penoj^Z; por tiu prezo la vesto ne estas kara; vi donis lignon nur por cent rubloj kaj enskribis por mil^Z; ŝanĝi ion por io; por la mono pastra preĝo, por la mono romp' de leĝo^Z; por sia oro ĉiu estas sinjoro^Z. Tio pravigas ankaŭ la *Z-an danki iun por io* (anstataŭ la logika *pro io*); fakte, la danko estas donata kvazaŭ interŝanĝe.*

Ĉe *Z.* ni trovas ankaŭ **pro**-adjekton signe de aĉetprezo kaj vendobjekto: *aĉeti*

bovojn pro dek sikloj; kion vi donas pro ĝi? kiom li postulas pro la feloj? Sed tio restis neimitata, escepte de la sola: okulon pro okulo, denton pro dento. Same ĉe li oni trovas ankaŭ kontraŭ: aĉeti birdon kontraŭ kelkaj spesdekoj; Damasko donis al Tiro grenon kontraŭ armiloj. Tian kontraŭ oni povas uzi, kiam ne temas pri speciala okazo, sed pri ĝenerala oferto: kontraŭ dek svisaj frankoj mi sendas serion da aŭstraj poŝtmarkoj. Post la verbo ŝanĝi ĉe Z. oni trovas ankaŭ je: mia popolo ŝanĝis sian gloron je idoloj.

3. Tio (persono aŭ ideo), kies intereson, profiton, utilon celas la predikata ago: *voĉdoni por iu; kolekti monon por mizeruloj; aĉeti ion por iu; batali por iu; ĉiuj por si, por ĉiuj Di'z; asigni difinitan salajron por iu; tiu ĉi speco de cel-adjekto jam konfuziĝas kun la dativa koncern-adjekto (vd. § 211).*

4. Tio, kio montras la destinitecon, uzon de iu frazelemento: *glaso, kiun oni uzas por vino^z; tio estas por vi; tio ne servas por uzo, sed nur por ornamo; al Sinjorino Eliza Orzeszko por signo de profunda estimo^z (dediĉo de libro).*

Rim. III. Tiasence oni kelkfoje uzas **por** ankaŭ metonimie: oni metas post ĝi substantivon, anstataŭ kies propra senco oni komprenas ties uzon. Kompreneble tio eblas nur, se la uzmaniero de la respektiva substantivo estas evidenta: *ŝtono servis al ili por seĝo* (sidado); *ili havis tendon por loĝejo* (loĝado); *manĝi fruktojn por deserto* (desertmanĝado). Vd. § 200, A. kaj 175.

LA KONCERN-ADJEKTOJ

210

La koncern-adjektoj esprimas ion, kion la ago koncernas, rilatas. Ili do estas nerektaj objektoj de la ago kaj kiel tiajn ni pritraktis ilin en la ĉapitro objekto (§ 179).

Tie ni vidis, ke ili estas aŭ simple koncernataj de la ago (*traktativaj: pri, je, teme de, koncerne al, rilate al*), aŭ ricevas ion sekve de la ago (*dativaj: al, por*) aŭ fordonas ion sekve de la ago (*ablativaj: de*).

Sed tiuj tri prepozicioj (**pri, al, de**) esprimas nur la movrilaton: la maniero de la ago dependas sole de la verbo. Nu, ekzistas okazoj, kiam la agmaniero estas modifita per prepozicioj, kiuj esprimas sendiferencon sendepende de la senco de la predikata verbo. En tiuj okazoj oni povas paroli pri veraj adjektoj.

La koncern-adjektojn ni pritraktos laŭ la sama divido kiel la objektojn: ni distingos traktativajn, dativajn kaj ablativajn.

Traktativa adjekto

Ĝia prepozicio estas **pri**. Ni menciis jam ĉe la objektoj (§ 176, Rim. I.), ke kelkajn **pri**-objektojn pli ĝuste estas rigardi adjektoj, ĉar ili neniam alprenas akuzativan formon: *kontenti, pravi, silenti* ktp. *pri io*.

Krom ĉi tiuj, ni devas ĉi tie okupiĝi pri la sekvantaj rilatoj:

1. Se la ago koncernas ion laŭ ties tuta amplekso, oni povas uzi **en**: *sukcesi en io; en tiu supozo vi estas malprava; partopreni en io; esti kulpa en io^z; egali iun en virto; havi plezuron en io; en ŝia eksterajo aperis*

ŝanĝoj^z; la bonaĵo en tio estas, ke...^z; en tiu demando ni ne konsentas; agi en ies intereso; diferenci en la detaloj; havi multan energion en la efektivigado^z; la Eternulo benis vin en ĉiu faro^z; en la nomo de la societo; labori en nia lingvo^z; tion faru nur en okazo de neceso. Tio estas precipe utila, kiam en la prop-o ekzistas alia pri-adjekto: li ne aŭskultis pri mi en tio; li sukcesis pri sia plano nur en kelkaj partoj.

2. La personon, pri kiu oni ion konstatas, oni povas signi per *ĉe*: *ĉe li oni neniam povas esti certa pri io; se ĉe iu elfalas la haroj^z; pli efikas riproĉo ĉe saĝulo ol cent batoj ĉe malsaĝulo^z. Se en la prop-o temas pri funkcio aŭ intima, interna kvalito de la person-noma adjekto mem, oni uzas **en**: *mia ŝirmo estas en Dio^z; mi admiras en ŝi la fidelecon; li havas en si grandan modestecon.**

3. Se iu frazelemento estas identigata al la adjekto, oni uzas **en**: *vidi en iu anĝelon, diablon; ni vidas en E-o la solan internacian lingvon; en tiu propono kuŝas la solvo de la problemo; vi vidis insulton en miaj sinceraj vortoj.*

Rim. I. Se, male, la adjekto estas identigata al iu frazelemento, oni uzas kiel: *rigardi iun kiel anĝelon* (vd. § 200, A.).

Rim. II. Pro tiu identiga signifo oni uzas **en** *ĉe konsisti en io*, kiu montras identecon, dum *konsisti el...* montras materialon.

4. La adjektojn, kompare al kiuj oni esprimas diferencon (*rilate, kompare al...*) oni povas enkonduki per *kontraŭ*, se la diferencon indikas komparacia vorto (*pli, superi, preferi* ktp.): *supereco de homo kontraŭ bruto ne ekzistas^z; multigu vin miloble kontraŭ via nuna nombro^z; ili vivas sub regado, kontraŭ kiu ili preferus la turkan^z; aŭ per *antaŭ*, se oni rangas pli alte la rilataton: *la pliboneco de E-o antaŭ Volapük estas senduba^z; aŭ per **al**: *preferi ion al io*. Sed se la diferenco estas esprimita nur per la sencoj de du kontraŭmetitaj substantivoj, sen komparacia vorto, oni uzas *ĉe*: *se lin kompari kun la nuna reĝo, li estis Apolono ĉe Satiro^z; aŭ **apud**: *li estis pigmeo apud tiu giganto.****

5. La bazon de konstato oni esprimas per *laŭ*: *ŝi estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco^z; koni iun laŭ la nomo^z; laŭ mia opinio vi estas malprava; laŭ la unua rigardo tio ŝajnas ĝusta. En kelkaj esprimoj oni trovas el kaj **en**: *el teoria vidpunkto tio estas absolute pravigebla; en liaj okuloj tio estas peko^z.**

6. Se la ago vekas metafore ideon pri loka rilato, oni povas uzi diversajn lokajn prepoziciojn: *persisti ĉe io* (kvazaŭ gluiĝante al ĝi); *regi super lando; labori super gramatiko* (kvazaŭ kliniĝante super ĝi); *vidi sur iu, ke li estas kolera; pendi sur la lipoj de oratoro.*

Rim. III. Oni neniam uzu **kun** ĉe traktativa adjekto; tiu nacia idiotismo estas tute superflua en E-o, kiu havas sian **pri**: *cedi kun (pri) postulo; esti singarda kun (pri) fajro; heziti kun (pri) io; avari kun (pri) afableco; rapidi kun (pri) konfido; atendi kun (pri) realigo de plano*; ĉi tie **kun**, kvankam Z-a, estas pura, nepre evitinda germanismo kaj facile evitebla per la uzo de **pri**.

7. Personojn aŭ objektojn, kiujn la ago koncernas en ilia reciproka interrilato, oni signas per **inter**: *dividi ion inter pluraj personoj; juĝi inter disputantoj; ili estas ligitaj inter si; batali inter si; simili inter si.*

8. Ce kelkaj adjektoj oni uzas **je**: *gravediĝi je filo; abundi je fontoj; alprunti je rentumoj; bapti iun je la nomo Petro; je mia honoro mi diras; stari je ies dispono; asekuri je alta sumo; aĉeti ion je ies kostoj; suferi, morti je malsano; malsaniĝi je lepro; soifi je (pri) kiso; aĉeti je kredito; kredi, furi je Dio; malsaniĝi je la okuloj; je mia miro, ĝojo, surprizo li plenumis sian promeson.* En preskaŭ ĉiuj aliaj okazoj oni uzas **pri** aŭ alian prepozicion (vd. § 179).

Dativa adjekto

211 La prepozicio de la dativa adjekto estas **al**: *certe okazis al li malfeliĉo; estas al mi varme, malvarme, bone, facile, ĝoje; kio estas al vi?; konduki bone al iu; kiel vesto en malvarmo estas kanto al suferanta koro^Z; starigi al iu monumenton; lavi al iu la piedojn^Z (lavi la piedojn de iu); bati al si la bruston^Z (bati sian bruston).*

Rim. I. Oni neniam uzu **kun** ĉi-okaze. *Kio estas kun vi?* estas nepre malĝusta.

Krom tiu pure dativa senco oni trovas ankoraŭ la sekvantajn, pli-malpli parencajn rilatojn:

1. La agant-adjekto kelkfoje estas rigardata kiel dativa kaj esprimita per **al**: *esti konata al* (anst. *de*) *iu*. Kp. § 119, C.

2. Se oni volas akcenti la destinitecon, oni povas uzi **por**: *porti donacon por iu; montri entuziasmon por E-o.*

3. En prop-oj esprimantaj sintenon, oni uzas:

a) se temas pri amika sinteno, la prepozicion **por**: *nia regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro^Z.* Se la amikecon de la sinteno montras jam la predikato mem, sufiĉas simple **al**: *konduki bone, juste al iu; esti favore agordita al iu.*

b) se temas pri malamika sinteno, la prepozicion **kontraŭ**: *faru ion kontraŭ tio^Z; batalu kontraŭ peko^Z; ribeli, konspiri, riproĉi, indigni, havi ion^Z kontraŭ io; ŝtopi la orelojn kontraŭ kriadado de malriĉulo^Z; ankaŭ ŝi ne estas indiferenta kontraŭ li^Z; malobeemaj vi estis kontraŭ la Eternulo^Z.*

c) se la maniero de sinteno ne estas esprimita, oni povas uzi **pri**: *mi faros pri li, kiel vi ordonis; sed ankaŭ kontraŭ: kiel li agis kontraŭ mi, tiel mi agos kontraŭ li^Z.*

Rim. II. Tiu supra distingo ne ĉiam estas strikte farata. Oni trovas **kontraŭ** ankaŭ ĉe amika sinteno: *vi estas tro bona kontraŭ mi.* Sed **por** estas uzata nur en la senco a).

4. Se la ago esprimas aŭ subkomprenigas reciprokecon, oni povas uzi **kun**: *paroli kun iu; identi, kontrakti, kontrasti, renkontiĝi, simpatii kun iu; geedziĝi kun iu* (sed prefere *edziĝi* aŭ *edziniĝi al iu*, ĉar ĉi tie mankas

la reciprokeco*; *enamigi kun iu* (se la amo estas reciprokata; sed *al iu*, se ĝi estas unuflanka).

Rim. III. Ĉe reciprokeco oni povas uzi **kun** anstataŭ **kontraŭ**: *lukti, batali kun iu*. Sed la kunteksto devas klare montri, ke ne temas pri kuna, komuncela batalado.

Rim. IV. Oni neniam uzu **kun**, se tiu reciprokeco mankas: *agu pli bone kun (pri, kontraŭ) ŝi; mi faros kun (pri, kontraŭ, al) li, kiel vi ordonis; se io okazos kun (al) mi; tiel estos kun (pri) tiu, kiu ne obeos* – ĉi tie **kun**, kvankam Z-a, estas evitinda kaj facile evitebla per la parentezaj formoj. Sed oni povas diri: *kiel vi estas unu kun la alia*², ĉar ĉi tie ekzistas reciprokeco.

5. Kiel ni vidis sub punkto 1., la personon, kies senton oni esprimas rilate al ia ago, oni signas per **al** (*estas varme al mi; ŝajnas al mi, ktp.*). Sed oni povas uzi ankaŭ **por**, precipe post estas kun predikativo: *tri aferoj estas nekompreneblaj por mi*²; *mia spiro fariĝis abomena por mia edzino*²; *tiu ĉi tago restos por mi memorinda*².

Rim. V. Oni povus fari la regulon, ke per simpla **al** oni simple konstatas ies sentelvokan efikon sur iun, dum per **por** oni akcentas la personan vidpunkton de la efikato pri difinita, aparta okazaĵo: *estas al mi varme* (absolute); *la (tiu) bano estas por mi varma* (relative; laŭ mia kutimo, sento, plaĉo).

6. Ĉe kelkaj verboj oni povas uzi **antaŭ**, profitante ties flanksencon ĉeeste **de**: *humiliĝi antaŭ iu; cedi antaŭ iu; depreni la ĉapelon antaŭ iu; esti responda antaŭ iu*².

7. Se la ago vekas metafore ideon pri loka rilato, oni povas uzi ankaŭ lokan prepozicion: *preni sur sin la respondecon; efiki sur iun; impresi sur iun; atingi ĝis io; meti iun antaŭ tenton, provon*.

Ablativa adjekto

La ablativa adjekto signas personon aŭ objekton, de kiu oni ion forprenas aŭ apartigas. La ĝenerala prepozicio estas **de**: *forpreni de iu ion*.

212

Sed oni kelkfoje uzas ankaŭ aliajn prepoziciojn.

1. Se oni apartigas parton el pli granda kvanto, oni uzas **el**: *tio restis el lia tuta gloro; trinku el tiu ĉi vino; li estas el tiuj, kiuj...; doni al iu el sia pano; elekti el granda nombro; el via fakturo mi ŝuldas ankoraŭ dek frankojn*.

2. Se oni faras apartigon, diferencigon ĉe du aferoj, oni uzas **inter**: *elekti inter du*²; *distingi inter reformo kaj pliriĝigo de la lingvo*; post inter oni povas uzi ankaŭ infinitivon: *elektu inter resti aŭ foriri*.

3. Post pasiva participo oni uzas **je**, por distingi de la agent-adjekto (**de**): *senigita je ĉiuj rajtoj; apartigita je mi; forprenita je ili*.

Rim. Pri disde vd. § 179, 3. Rim. V.

4. Ĉe kelkaj verboj oni uzas **antaŭ**, profitante ties flanksencon ĉeeste **de**: *kaŝi antaŭ iu, fuĝi antaŭ iu*.

* Ĉar: li edziĝas, sed ŝi edziniĝas.

213

Kiel oni vidas, la stataj kaj modalaj adjektoj kaj la nerektaj objektoj montras plenan paralelecon inter si kaj kun la adjektoj lokaj kaj tempaj, rilate al la movdirekto, kaj laŭ tio ili estas klaseblaj en tri grupojn, analogajn al la lokaj adjektoj poziciaj, demovaj kaj almovaj:

Movdirekto	Senmovo	Demovo	Almovo
Lokaj adjektoj	poziciaj	demovaj	almovaj
Tempaj adjektoj	aktualaj	komencaj	finaj
Stataj adjektoj	situaciaj	originaj	rezultaj
Modalaj adjektoj	manieraj	kaŭzaj	celaj
Koncernadjektoj	traktativaj	ablativaj	dativaj
Nerektaj objektoj	traktativaj	ablativaj	dativaj

Tiu paraleleco de la unuopaj specoj de adjektoj komprenigas, ke kelkfoje la distingo inter ili ne estas akra, la limoj forviŝiĝas, kaj la saman adjekton oni povas klasi en du rubrikoj. Tion la studento certe rimarkas ĉe la ekzemploj, ne necese citi tie ĉi okazojn.

Rim. Oni ĝenerale evitas uzi tian prepozicion, kies senco estas jam esprimita de la adjektsubstantivo mem. Pro tia mal-emo al pleonasmo oni diras ekzemple: *en* (ne: *laŭ*) *maniero*; *el* (ne: *pro*) *ia kaŭzo*; *kun* (ne: *per*) *helpo*; *kun* (ne: *por*) *celo*. Tio ne estas regulo; tamen, ĝenerala tendenco.

B. SPECJOJ DE LA PROPOZICIOJ

I. – SPECJOJ LAŬ VALORO

La ĝis nun studitaj fraz-elementoj grupiĝas en propozicion, kiu esprimas kompletan opinion. Tiu propozicio povas alpreni diversajn formojn kaj valorojn: laŭ tio oni distingas propoziciojn indikajn, dezirajn, ordonajn kaj demandajn.

Indika propozicio

La indika propozicio estas la plej simpla speco. Per ĝi oni simple rakontas, diras, asertas ion; tial ĝia predikato staras plej ofte en indikativo: *ĉiu vulpo sian voston laŭdas^Z*. Oni povas akcenti ĝin per *ja*: *ja se vi agos bone, vi estos forta^Z*; *ja la ĉielo... ne povas vin ampleksi^Z*; *mi ja estas pli scianta ol ŝi!^Z*; *tio ne estas ja peko, ne povas esti peko!^Z*; aŭ per duobla negacio: *li ne estas sen saĝo*.

Post la indika propozicio oni metas punkton.

Kelkfoje la indiko estas supoza: tiam la predikato estas kondicionala: *li elspezus eĉ la trezoron de Dario* (se li ĝin havus).

Per tia kondicionalo oni esprimas kelkfoje negacion pri iu frazelemento: *ĉe bonaj cirkonstancoj mi entreprenus tiun laboron* (la cirkonstancoj ne estas bonaj). Se la respektiva fraz-elemento havas negacian valoron, la negacia kondicionalo esprimas pozitivan aserton: *sen via helpo mi ne estus sukcesinta* (vi helpis, do mi sukcesis). Vd. § 199.

Per kondicionala aserto kelkfoje oni esprimas deziron: *mi manĝus ion*; aŭ timemon, ĝentilecon: *mi volus vin viziti*; *mi petus pri iom da pacienco*. Vd. § 116, b.

Rim. I. Speco de indika propozicio estas la *ekkria propozicio*: *kiel bela estas tiu virino!*; *kiom mi devis klopodi!* Tiajn prop-ojn oni finas per krisigno (!).

Rim. II. **D u b o n** oni esprimas per la adverboj: *eble*, *miaopinie*, *verŝajne*, *iel*, *kvazaŭ* aŭ per intermetita *ŝajnas*.

Dezira propozicio

A) Per ĝi oni esprimas deziron. Deziran modon E. ne havas; la modo, ĉe nerealigebla deziro, estas ĉiam kondicionalo kaj la prop-o estas enkondukita per *se*; ofte oni almetas **nur**: *se nur li portus bonan sciigon!* *se ankoraŭ vivus nia patrino!*

214

215

Per la aldono de **nur** aŭ **almenaŭ** oni povas neprigi, ke temas pri *dezira* kaj ne pri *supoza se... us: ha! se subite ĉiuj ĉi bestoj retrovus sian liber-econ! Kia teruro en la urbo!* – sed: *ha, se nur mi retrovus mian liber-econ!*; aŭ: *se almenaŭ ili estus ridintaj!*

Ĉe realigebla deziro oni povas uzi ankaŭ volitivon: *ja ne rompiĝu lia koro pro l' doloro granda!*

La deziran prop-on oni finas per krisigno. Rim. Oni ne uzu ke ĉi-okaze.

B) Najbara al la dezira prop-o estas la ekkrio, per kiu oni esprimas agon, kiun oni deziras evitota. En tia okazo, oni trovas, laŭ la nuancoj (timo aŭ simple malĝojiga supozo) **ke... nur** plus la volitivo aŭ **se... nur** plus la futuro: *nun mi iras vojaĝi, diris la flikilo; ke mi nur ne perdiĝu!² hu! la akvo estas malvarma. Ke mi nur ne malsaniĝu!² tio estas tro multe, diris la malnova strata lanterno; koran dankon! se oni nur ne refandos min!²*

Tiu escepta uzo de subjunkcio komence de sendependa propozicio klariĝas per la elipso de ĉefpropozicio (*Dio volu... Estus feliĉo...*).

Ordona propozicio

216

La ordonon oni esprimas per volitivo, aŭ, en la administra stilo, per infinitivo; kelkfoje oni trovas infinitivon ankaŭ en la literatura lingvo por tre emfaza ordono: *estingi ĉiujn lampojn!* (Grabowski).

La ordonon oni povas mildigi per formuloj: *bonvolu; mi volus, ke...; mi dezirus ke...; estu tiel kompleza, kaj...*

En la ordonaj prop-oj oni ofte uzas alparolon: *venu, amiko! facila ven-to, lulu! min! kuru, kara, inter miajn brakojn!* Tiaj alparoloj estas uzataj, cetere, ankaŭ en la ekkriaj, demandaj kaj deziraj prop-oj. Post la ordona prop-o sekvas krisigno.

Malpermeson oni esprimas per **ne** kaj volitivo aŭ infinitivo: *ne iru tien! ne ekpepi!²* Oni ĝin ofte mildigas per: *gardu vin, ke..., atentu, ke..., mi avertas, ke...*

Demanda propozicio

217

Per ĝi oni volas orientiĝi pri io.

La modo estas normale indikativo. Tamen oni trovas ankaŭ la volitivon aŭ kondicionalon, laŭ la esprimota senco: *kiun lokon mi legu al vi?²; kaj kial la bestoj tion ne faru, se ili povas?²; kial homo ne povus krei lingvon?*

La demando povas rezulti el la simpla tono, per kiu la frazo estas prononcata: *eble la viro ne volos iri kun mi?²; unu pekis, kaj vi volas koleri la tutan komunumon?²*

Sed ordinare ĝi estas esprimita per ĉu aŭ per unu el la demandaj tabel-vortoj: *ĉu oni ne sendis vin?; kiu venis?; kiam vi estos preta?*

Ĉe duobla demando oni ne ripetas la demandilon, precipe, se la subjekto estas la sama: *ĉu vi obeos kaj faros la taskon?; kiu uzis tiun libron kaj ŝiris el ĝi paĝon?*

Se la demando trafas du elementojn de la sama prop-o, pli klare estas esprimi la demandon per du apartaj prop-oj. Anstataŭ: *kiu kiun mortigis?* oni prefere diru: *kiu mortigis kaj kiun?* Tamen tia dirmaniero estas allasebla, se oni celas nepre koncizecon: *Kiu estas Kiu?* (titolo de kolekto da biografioj), aŭ frapantecon: *kruda besta forto, por kiu ekzistas nur la demando "kiu kie super kiu kaj en kia grado devas regi?"*^z.

Akcenti demandon oni povas per nu aŭ do: *kion do vi faras? – Nu, kial vi silentas?*

Rim. Dank'al tiu signifo, do povas nepriki la demandan sencon de la korelativoj kiel, kiu ktp., kaj malhelpi momentan konfuzon kun la rilata signifo: *kiel do vi ŝanĝigis ĉe mi je vinberbranĉo sovaĝa?*^z (Kp. ankaŭ § 230, Rim. II.).

Kelkfoje la demandon oni esprimas en formo de indiko kaj oni postmetas la demandan vorton kun ne: *li jam foriris, ĉu ne?* Oni uzas tia-okaze ankaŭ *ĉu vere* aŭ *ĉu ne vere?* La anglamania uzo, t.e. *ĉu ne* post jesanta kaj *ĉu* post neanta propozicio: *li ne foriris, ĉu?* ne estas deviga en Esp-o: plejparte oni uzas *ĉu ne* ankaŭ lastokaze.

Se oni ripetetas ies diron demande, oni ne metas ĉu: *ni nenion scias pri la afero. – Vi nenion scias?*

Ofte oni demandas ion neante, kiam oni atendas jesan respondon: *ĉu li ne estas simila al mia frato?*

La demandaj prop-oj estas divideblaj en du grupojn:

1. *Tutecaj demandoj.* Oni demandas pri la tuta enhavo de la prop-o. Ilin enkondukas ĉu. Al tiaj demandoj oni respondas per *jes*, *ne*, *tute ne*, *absolute ne*, *neniel*, *neniom* ktp. Oni povas respondi ankaŭ ripetante la demandan verbon: *ili diris al ŝi: ĉu vi iros kun ĉi tiu virino? Kaj ŝi diris: Mi iros*^z. Sed tiu formo apartenas al la biblia stilo kaj ne estas kutima en la kuranta prozo. Tamen, oni uzas tian ripeton, kiam oni respondas jese al nea demando: *ĉu vi ne iros tien? Jes ja, mi iros.* Oni trovas ankaŭ *tamen* uzata en tia okazo: – *Terure enamiĝinta! – Ne en unu el la filinoj de Dro Jeddler, diris Snitchey...? – Tamen! respondis la kliento*^z. Vd. § 91. II.

2. *Partecaj demandoj.* Oni demandas pri unu vorto, reprezentita per la demanda tabel-vorto. Oni respondas per la pridemandita vorto aŭ per (subordita) propozicio: *kiun vi vidis? Petron; kiam vi venos? Morgaŭ; kia estas la vetero? Bela; kien vi iras? Promeni; kial vi malĝojas? Ĉar min trafis malfeliĉo.*

Post la demandaj prop-oj sekvas demandosigno.

II. – SPECJOJ LAŬ ENHAVO

La propoziciojn oni povas distingi ankaŭ laŭ la frazelementoj en ili troveblaj:

1. La propozicion, en kiu troviĝas nur la du ĉefaj frazelementoj (subjekto plus predikato) oni povas nomi *primitiva propozicio*: *la hundo bojas; li venis; ili ludas.*

Rim. I. Pri la elipsaj prop-oj, en kiuj mankas eĉ unu el la ĉefaj frazelementoj, vd. §§ 164, 166, 167, kaj 219, Rim. I kaj II.

2. La propozicion, en kiu troviĝas ankaŭ komplementoj, oni povas nomi **komplementita propozicio**: *la hundo bojas furioze en la korto; li venis malfrue al la festo; ili ludas karton je grandaj sumoj*.

3. Ekzistas propozicioj, kiuj havas plurajn samspecajn frazelementojn. Tiam oni parolas pri **pluroblaj frazelementoj** kaj tiajn prop-ojn oni nomas **kuntiritaj frazoj**, ĉar, laŭ pura teoria vidpunkto, ili povas esti dissolvitaj en tiom da apartaj, memstaraj propozicioj, kiom da samspecaj frazelementoj ili entenas: *liaj vangoj kaj okuloj ardis* (du subjektoj); *la arbaro zumis, susuris, flustris* (tri predikatoj).

La samspecaj frazelementoj estas aŭ ligitaj per konjunkcio aŭ disigitaj per komo. Vd. § 221-224.

Rim. II. Tiaj kuntiritaj frazoj, post la dissolvo, iĝas memstaraj propozicioj; t.e. unu el ili ne anstataŭas frazelementon de la alia, sed ĉiu el ili ricevas siajn proprajn frazelementojn, sufiĉajn por memstara senco; ekzemple, la unua supra frazo dissolvigaĵe jene: *liaj vangoj ardis kaj liaj okuloj ardis*. Tio klarigas, kial en tiuj kuntiritaj frazoj povas troviĝi du negacioj ne detruantaj unu la alian (vd. § 91, Rim. II.), kaj kial oni ne povas uzi *sia* antaŭ unu parto de tia komplekso por resendi al la alia parto (vd. § 160, II. a).

Rim. III. Oni povas ofte fari unu prop-on ankaŭ el tiaj propozicioj, el kiuj unu anstataŭas frazelementon de la alia, do ne havas memstaran sencion. Ekzemple: *li havas ringon, kiu kostis grandegan sumon* – *li havas ringon kostintan grandegan sumon* (epiteto); *mi forgesis, kion vi diris* – *mi forgesis la (aferon) diritan de vi* (objekto). Tian oni povas nomi **kunfandita frazo**.



NB. *Propozicio* estas analiza dismeto de kompleksa aga aŭ stata koncepto en sintakse interrilatajn detal-konceptojn, kiuj formas fermitan unuon, necesigantan la esprimon de tempo kaj modo; sendepende de tio, ĉu tiu sintaksa unuo estas sence memstara, aŭ dependas de alia, simile dismetita koncepto. Ekzemple: la koncepto *hundbojo* dismetiĝas en la propozicion *hundo bojas*. Sed la komplekso *hundbojo* povas dependi de alia komplekso: *mi aŭdas hundbojon*; tiu dependeco restas ankaŭ en la propozicia formo: *mi aŭdas, ke hundo bojas*. Tiajn, sence ne memstarajn, kompletigajn propoziciojn oni nomas **dependaj propozicioj**: *ĉar vi ne venis...*; *ke vi iros tien*; *se foriras la katoj...*

Frazo estas dismeto de *sence kompleta, memstara* kompleksa koncepto en sintakse interrilatantajn detalkonceptojn; ekzemple: *hundboj-aŭdo* dismetiĝas en: *oni aŭdas, ke hundo bojas*. El tio sekvas, ke propozicio povas esti samtempe ankaŭ frazo; (*hundo bojas*; *la domo estas blanka*), sed ne ĉiam (*ke vi iros tien*); aliparte frazo povas konsisti ankaŭ el pluraj propozicioj (*ĉar vi ne venis, ni ne povis aranĝi la aferon*; *mi ne sciis, ke vi iros tien*; *se foriras la katoj, festenas la ratoj*).

La unupropozicia frazo estas la **simpła frazo**, la plurpropozicia estas la **kompleksa frazo**.

III. FRAZSINTAKSO

1. LA KOMPLEKSA FRAZO

219

La kompleksa frazo unuigas en si du aŭ plurajn propoziciojn. Tiujn oni nomas membroj de la frazo.

La membroj de la kompleksa frazo povas dumaniere rilati inter si: aŭ ili estas simple *apudmetitaj*, aŭ unu estas *subordita* al la alia.

1. La apudmetitaj propozicioj estas ja kunligitaj, sed unu ne dependas de la alia; unu ne estas kompletiga parto (kvazaŭ frazelemento) de la alia; ambaŭ estas samrangaj propozicioj. Oni nomas ilin **kunorditaj propozicioj**. Tiaj estas ekzemple: *dormas la vento, ripozas la ondoj; multe li parolis, sed ĉio estis vana, li ne povis lin konvinki*.

2. La **subordita propozicio** estas kompletiga parto de alia propozicio, de kiu ĝi dependas. Pli mallonge oni ĝin povas nomi ankaŭ **subpropozicio**. Tiu propozicio, de kiu la subpropozicio dependas, estas la dependiga propozicio aŭ **ĉefpropozicio**. Ĉiu subpropozicio anstataŭas ĉefpropozician frazelementon. Ekzemple: *ŝajnas* (kio?), *ke li ne venos* (subprop-o anstataŭanta subjekton); *montru*, (kion?) *ke vi estas kuraĝa* (subprop-o anstataŭanta objekton).

Unu ĉefpropozicio povas havi plurajn subpropoziciojn. Tiuj subprop-oj povas havi inter si trispecajn rilatojn:

a) ili povas esti kunorditaj: *mi vidis, ke li falis kaj kuŝas en la koto; mi esperas, ke mia voko ne estos vana, sed ĝi baldaŭ eĥe resonos...*² (rimarku la mankon de **ke** en la dua subpropozicio).

b) ili povas esti sendependaj inter si kaj suborditaj ambaŭ rekte al la ĉefprop-o: *kiam mi venis en la ĉambron* (subprop-o), *mi vidis* (ĉefprop-o), *ke li skribas* (subprop-o); *mi faros ĉion* (ĉefprop-o), *kion mi promesis* (subprop-o dependa de la ĉefprop-o), *kvankam mi estas tre okupita per aliaj laboroj* (subprop-o dependa rekte de la ĉefprop-o).

c) unu povas esti subordita al la alia, kiu do, siavice, estas ĉefprop-o de tiu alia subprop-o: *mi sciis* (ĉefprop-o), *ke li ne faros* (subprop-o), *kion li promesis* (subprop-o de subprop-o). Tiam ni parolas pri **dua grada subprop-o**.

Rim. I. En kunorditaj propozicioj oni ne devas ripeti la subjekton, se ĝi estas identa en la subprop-oj: *li eksaltis, sed falis kaj sterniĝis sur la tero*. Male, en suborditaj prop-oj oni ĝin devas ripeti, aŭ anstataŭigi per persona pronomo: *Paŭlo sciis, ke li vane atendas; mia amiko skribis, ke li ne venos; li kuris, kiel li povis; li ne skribis, kiam li venos; mi diros ĉion, kiam mi revenos*. Vd. § 47, 1.

Rim. II. En kelkaj suborditaj prop-oj estas ellaseblaj ĉiuj komunaj elementoj, do ankaŭ la subjekto, sed nur, se ankaŭ la predikato estas ellasita: *li tremis, kiel aŭtuna folio* (tremas). Kelkfoje oni povas ellasi "ĝi estas": *tiu varo, kvankam* (ĝi estas) *kara, ne estas bona*. Tiajn prop-ojn oni nomas *elipsaj*. Tre oftaj estas tiaj elipsoj en la prop-oj kunorditaj: *mi ne atendis vin, sed ŝin* (mi atendis).

A. KUNORDITAJ PROPOZICIOJ

La kunorditaj propozicioj estas ses-specaj: *kopulaj, alternativaj, adversaj, konkludaj kaj klarigaj*, krome *pseudosubpropozicioj*. Kunorditaj estas ankaŭ la prop-o anoncanta parolanton kaj la laŭvorte citata parolo (*parolo rekta*).

220

Propozicioj kopulaj

Por ke la parolo ne estu tro abrupta, oni kunligas du aŭ plurajn simplajn frazojn. Tiuj estas la *propozicioj kopulaj*.

221

La kunligo povas okazi ankaŭ sen konjunkcio: *liaj okuloj brulis, liaj vangoj ardis; mi venis, vidis, venkis*.

La konjunkcioj kopulaj povas esti unuopaj kaj duopaj.

I. La unuopaj konjunkcioj estas: *kaj, ankaŭ, kiel ankaŭ, cetere, krome, same, fine; nek* (se la antaŭa prop-o jam enhavas neon), eĉ (por aldoni ion surprizan). El ili *kaj kaj nek* staras ĉiam komence de la prop-o, la aliaj povas stari en la komenco, sed ankaŭ interne de la prop-o: *penu, hom', kaj firme fidu!; forpasis unu tago, forpasis ankaŭ la dua; faru vian taskon, kiel ankaŭ mi faris la mian; mi ne iros tien, cetere tio estus superflua; mi donis al li konsilon, krome mi helpis lin ankaŭ per mono; li abdikis, mi same; li meditis longe, fine (poste) li diris; mi ne vidis lin, nek scias ion pri li; li tute konfuziĝis, eĉ respondi ne sciis*.

Escepte de *kiel ankaŭ kaj nek* ĉiuj supraj konjunkcioj povas kombiniĝi kun *kaj: pluvis kaj ankaŭ ventis*.

II. La duopaj konjunkcioj estas: *kaj... kaj, parte... parte, kiel... tiel ankaŭ, kiel... tiel same..., nek... nek, ne nur... sed ankaŭ, ne sole... sed eĉ*. Ekzemple: *kaj pluvas kaj neĝas; parte laŭ mia konsilo li faris tion, parte laŭ sia propra iniciato; kiel vi, tiel ankaŭ li estas mia amiko; nek lin mi vidis, nek ŝin; ne nur oni punis lin, sed li devis kompensi ankaŭ la faritan malutilon*.

Rim. I. La anglamania uzo de *ambaŭ... kaj...* estas nekorekta ("tute ne aprobinda", diris Z. en siaj Lingvaj Respondoj). Oni diru aŭ *tiel... kiel ankaŭ* aŭ *kiel... tiel ankaŭ*, aŭ ... *kaj ...*, *ambaŭ*. Ekzemple: *Petro kaj Paŭlo, ambaŭ estas miaj amikoj. Tiel Petro, kiel ankaŭ Paŭlo estas miaj amikoj*. Oni povas uzi ankaŭ *kaj... kaj: kaj Petro kaj Paŭlo...*²

Rim. II. Kopulaj oni povas rigardi ankaŭ la prop-ojn ligitajn per *des* (tiom) pli. Ekzemple: *mi ne aprobas vian projekton, des malpli mi vin helpos pri ĝi*.

La alternativaj propozicioj indikas diversajn eblojn, el kiuj unu validas, okazas aŭ devas okazi. Oni povas distingi inter ili diversajn sencdiferencojn:

1. La propozicioj simple indikas la imageblajn eblaĵojn; konjunkcio: **aŭ**: *la ŝipo kuris sur rifon, aŭ ia alia malfeliĉo ĝin trafis; diru tion al la kapitano aŭ al la leŭtenanto.*

Per **aŭ** oni povas esprimi ankaŭ ĝustigon, precizigon, almetante **pli ĝuste** aŭ **prefere**: *tiel agi estas elturniĝo aŭ pli ĝuste perfido; li pagis cent frankojn, aŭ pli ĝuste naŭdek ok; tion oni esprimu per DE, aŭ prefere per EKDE.*

Rim. I. Pri la ekvivalentiga **aŭ** vd. § 131.

Rim. II. Post ordona propozicio **aŭ** povas enkonduki prop-on, kiu montras la konsekvencon de la neobeo al la ordono: *foriru, aŭ* (se vi tion ne faros) *mi vin elfetos; ne kriiu, aŭ mi vin batos.*

2. La frazo esprimas insiste, ke la diritaj ebloj estas la sole imageblaj; konjunkcioj: **aŭ... aŭ...: diru tion, aŭ al la kapitano, aŭ al la leŭtenanto; aŭ mi perdis mian horloĝon, aŭ iu ĝin ŝtelis; nun oni devas aŭ venki aŭ morti.**

Rim. III. Se la alternativaj prop-oj formas kune kompletivon de ĉefprop-o, la unua estas enkondukita per **ĉu**, la alia per **aŭ**: *mi ne scias, ĉu li venos aŭ ne; ni vidos, ĉu li plenumos sian promeson, aŭ simple mistifikis nin* (vd. § 230, 3.).

3. La frazo insistas pri tio, ke la elekto el la ebloj estas duba, necerta. Konjunkcioj: **eble... eble...: eble jes, eble ne; eble mi akceptos, eble mi rifuzos la postenon, ankoraŭ mi ne decidis.**

Rim. IV. Se la kaŭzo de io estas duba, oni povas ligi la kaŭzadjektojn per **ĉu... ĉu**: *ĉu pro timo, ĉu pro fiereco, li nenion respondis*². Tiajn kaŭzadjektojn oni devas ĉiam antaŭmeti. En neniu alia okazo oni esprimu la dubon per duobla **ĉu**. Krude malkorekte estas uzi simplan **ĉu** anstataŭ **aŭ**: *li estas botisto, ĉu ŝuisto* (?!). Oni diru: *aŭ eble ŝuisto*. Kp. § 258, IV.

4. La frazo insistas pri tio, ke la elekto estas indifera. Tiaokaze ekzistas du eblaĵoj:

a) la frazo esprimas, ke io validas malgraŭ laŭplaĉe elekto. La senco do estas *konceda*. Konjunkcioj: **ĉu... ĉu...: ĉiu homo, ĉu reĝo, ĉu almozulo, estas homo antaŭ Dio; ĉu li venos, ĉu li ne venos, ni ne atendos pli ol duonhoron**. Vd. § 258, IV.

b) la frazo esprimas, ke oni povas laŭplaĉe elekti. Por tiu senco ĝis nun ne ekzistas speciala konjunkcio en Esp-o.

Rim. V. Oni povas uzi tiasence la konjunkcio-paron **ajne... ajne**: *nun vi povas ajne legi, ajne promeni*. Per la sama konjunkcio-paro oni povas ligi ankaŭ propoziciojn, por signi, ke estas egale, kiun ajn el la du agoj oni faras: *ajne venton vi batos, ajne lin vi admonas; ajne doni la monon al li, ajne elfeti ĝin tra la fenestro*.

5. La frazo esprimas, ke ambaŭ ebloj validas, sed alterne. Konjunkcioj: **jen... jen**: *jen ŝi ploris, jen ŝi ridis; ŝi portas sur sia brusto jen floron, jen diamanton*.

Propozicioj adversaj

223

La adversaj prop-oj estas sence kontraŭaj unu al la alia. Oni povas distingi tri kazojn:

1. La enhavo de ambaŭ propozicioj estas reala. Tiajn prop-ojn ofte oni kročas sen konjunkcio: *multaj estas la ordonantoj, malmultaj la obeantoj*. Oni povas uzi ankaŭ **kaj**. Ekzemple: *ofte pereas la tritiko kaj restas la lolo; la lango laboras, kaj la mano nenifaras*. Por altiri la atenton al alia ago de alia subjekto, oni povas uzi **siavice**, **siaflanke**: *li venis en strata vesto; la aliaj siavice portis frakon*.

Se oni volas marki la kontraston, oni povas uzi: **dum kaj dume**: *li estas kuraĝa, dum lia frato estas leporkorulo; lia patro estis honesta homo, dum li estas fripono; vi nur babilis, kaj dume mi laboris anstataŭ vi*.

Rim. I. Dum (latindevena) estas subjunkcio (kaj prepozicio), sed en tiu ĉi adversa signifo ĝi funkcias konjunkcie. Des pli superflua kaj mallogika ŝajnas la formo **dum ke**, proponita por tiu ĉi rolo, ĉar ĝi volas neprigi *konjunkcian* signifon per kombino kun la *subjunkcio* **ke**.

2. La enhavo de ambaŭ propozicioj estas reala, sed la dua diras la kontraŭon de tio, kion oni povus konkludi el la unua. Konjunkcioj: **sed kaj tamen**.

Ĉe akra kontrasto oni uzas **sed ja** aŭ **sed tamen**. La unuan ĉe insista aŭ surpriza, la alian ĉe intenca, spita kontraŭeco. Ekz-e: *mallongan vivon donis al ni la Naturo, sed ja eterna estas la memoro de la bone plenumita vivo; do nun sendube ni havos pacon, sed ja kruelan; mi invitis lin, sed tamen li ne venis*.

Tamen oni uzas, se la unua prop-o havas sencon koncedan (vd. § 258): *oni traktis lin bone, tamen li timis; multe li pekis, tamen mi lin pardonas*. Oni povas uzi ankaŭ **sed**, sed tiaokaze en la unua prop-o oni devas meti **ja**: *li ja ne diris, sed mi divenis*. En tiaj prop-oj oni insistas per **tamen**: *vi klopodis ja multe sed mi tamen ne estas kontenta pri via laboro*.

Tiajn koncedajn prop-ojn oni povas enkonduki ankaŭ per **nu**, kiu do anstataŭas tiaokaze malfortan adversan konjunkcion: *nu, mi ne neas, ke li estas brava homo, sed vian laŭdon mi tamen trovas troigita*.

Rim. II. Sed estas uzata, en parolado aŭ disertacio, ankaŭ por signi revenon al la interrompita temo: *sed ni parolu ree pri tio...*². Krome, en dialogo, por kontesti la verecon de aserto: "mi renkontis lin hieraŭ". – "Sed, tio estas neebla, li ja forvojaĝis antaŭhieraŭ".

3. La unua prop-o neas (aŭ asertas) ion, kaj la dua asertas (aŭ neas) ion anstataŭe. La konjunkcio estas **sed**: *ne manĝon li bezonas, sed trinki li volas; tio, kion vi vidas en la malproksimo, estas ne homo, sed arbedo; oni vokas la bovon ne festeni, sed treni²; ŝtalo estas fleksebla, sed fero ne²*.

Rim. III. Tial, ke oni havas la saman konjunkcion por la sencoj sub punktoj 2. kaj 3., kelkfoje estigas malagrabla ripeto: *mi venos tuj, sed ne atendu min, sed iru*

antaŭe. En tiaj okazoj oni uzu **tamen** por la senco sub punkto 2. (por la senco sub punkto 3. estas uzebla ekskluzive **sed**): *mi postkris lin, tamen li ne haltis, sed forkuris; ni povus citi ankoraŭ multajn ekzemplojn, tamen ni ne parolos plu pri tio ĉi, sed ni diros sole, ke...*².

4. La dua prop-o konkludigas la plenan neeblecon de la unua-propozicia enhavo. Konjunkcioj: **ne nur ne... sed eĉ...: li ne nur ne estas mia amiko, sed mi neniam lin eĉ vidis; li ne nur ne estas riĉulo, sed ne havas eĉ unu groŝon; li ne nur ne riparis la aparaton, sed eĉ komplete ĝin fuŝis**. Tiaj frazoj enhavas iom da afekcia forto oni do povas ilin nomi **propozicioj protestaj**.

Ankoraŭ pli emfazebla estas la afekcio per kiel **do** aŭ per **eĉ ke**, sed tiam temas jam pri subprop-oj konsekvenca-indikaj (vd. § 265, 3. c).

Pri la prop-oj klarigaj-adversaj, vd. § 225.

Propozicioj konkludaj

224

La konkluda prop-o esprimas ion, kio sekvas el la antaŭa prop-o (ĉi tiu do diras la kaŭzon de la posta prop-o).

Konkludaj konjunkcioj: **do, pro tio, tial, sekve**.

Ekzemploj: *tiu homo ĉion elklaĉas, estus do domaĝe sciigi al li la aferon; estas bela frosta vetero, tial mi prenas miajn glitilojn²; vi faris la eraron, sekve vi devas ĝin ripari*.

Rim. Do kaj sekve povas ligi ankaŭ frazelementojn: *tiun nepripensitan, do danĝeran agon mi ne povas aprobi; li devis repreni sian ne sufiĉe argumentitan, sekve tre malvarme akceptitan proponon*.

Propozicioj klarigaj

La klariga prop-o klarigas, motivas la enhavon de la antaŭa prop-o. Konjunkcioj: **ĉar, tio estas (t.e.), nome, ja, despli ke aŭ tiom pli ke: sendu la leteron eksprese, ĉar nur tiamaniere ĝi alvenos ĝustatempe; la akuzativo montras direkton, tio estas, movadon al ia loko²; li havas du infanojn, nome unu filon kaj unu filinon; li helpis lin, nome li akiris por li oficon; ne timu, mi ja ne volas vin ofendi; faru la aferon mem, vi havas ja sufiĉe da tempo; eble estos pli bone, se ni aŭskultos la historion, des pli, ke ĝi estas mallonga²; ni ne devas fari tion, tiom pli, ke la agadmaniero de C. ŝajnas al mi ne tre fidinda²; la verko estas tre utila, tiom pli, ke la eldonanto volas ĝin disvastigi en granda nombro²**.

Kelkfoje **tiom pli** aŭ **des pli** eniras la antaŭan frazon kaj **pli** faras komparativon kun ties adjektiva predikato; tiam oni povas paroli jam pri **klariga subpropozicio**: *lia subfosado estas tiom pli danĝera, ke ĝi estas farata sub la masko de amikeco²; mi trovas lin tiom pli suspektinda, ke (ĉar) li ŝajnigas tiel grandan afablecon; ŝia parolo estas des pli ĉarma, ke ŝi iomete kartavas*.

Rim. I. Kelkfoje mankas en tia frazotipo la subjunkcio **ke**, kaj **tiom pli** ŝajne servas nur por esprimi ian komparacion absoluta (vd. § 70): sed temas efektive pri la

sama afero (kiel montras la transpono de la antaŭaj ekzemploj: *sub masko de amikeco, lia subfosado estas tiom pli danĝera* ktp.): *oni poste tiom pli senzorge povas ripozi^z; ĉe la sensignifeco de la simptomoj, tiom pli granda atento devas esti turnata al la plendoj de la paciento^z.*

Rim. II. Alian tipon de klariga propozicio prezentas la frazoj, en kiuj la kaŭzo estas esprimita per adjektivo: en tia okazo oni reliefigas tiun adjektivon kaj per inversio kaj per tiel: (*la portreto*) *verŝajne ankaŭ havis la aĝon de duono da jarcento, tiel malnova ĝi aspektis^z; la malgranda elfo tute ne povis dormi, tiel forta estis la frapado^z; la najbaraj konversacioj... ŝajnis destinitaj por la eksporto, tiel laŭtaj ili estis.*

Kiel oni vidas, oni uzas ĉar por motivi (vd. § 267), **tio** estas por ekspliki ion per aliaj vortoj, **nome** por klarigi pli vaste la enhavon de la unua prop-o, **ja** por aludi pri motivo, **des pli ke** kaj **tiom pli ke** por aldoni motivon kroman, neatenditan.

Se la dua prop-o pruvas la enhavon de la antaŭa, oni uzas **fakte**, **efektive**: *mi ne pledis por tiu afero; fakte, mi ne ĉestis la kunsidon.* Oni trovas ankaŭ **pruve** tiaokaze.

Negacian prop-on oni povas motivi ankaŭ per **sen tio**, montrante per ĝi la superfluecon de la negata ago: *ne fabelu pri fantomoj al la infano; li sen tio estas tro timema...; mi ne invitos lin; li venas al ni jam sen tio tro ofte.*

Krome ekzistas **klarigaj-adversaj prop-oj**: la unua propozicie asertas ion, kion la dua motivas, montrante, kio estus okazinta en mala okazo; konjunkcioj: **ĉar alie**, **ĉar male**, sed **ĉar** povas esti ankaŭ forlasita. La *modo* de la dua prop-o dependas de tio, ĉu la enhavo de la unua prop-o estas fakta, aŭ ne.

1. Oni uzas indikativon, se la unua prop-o anoncas ion nefaktan ankoraŭ: ordonon, devon, neceson. Nome, tiaokaze la malo de la celata ago estas ja ebla (k a z o e b l a): *faru ĉion eblan, (ĉar) alie vi ne sukcesos; obeu, (ĉar) male oni vin tradraŝos; mi devas rapidi, alie mi malfruos; granda lerto necesas, male oni fuŝas tian aferon.* Vd. ankoraŭ § 222, Rim. II.

2. Oni uzas kondicionalon, se la unua prop-o anoncas nepran fakton, do la enhavo de la dua prop-o estas fiktiva: *li laboris tage-nokte, alie li ne estus povinta fari sian taskon* (li faris ĝin); *mi kuris dum la tuta vojo, alie mi estus malfruinta* (mi ne malfruis).

3. Oni uzas indikativon aŭ kondicionalon laŭplaĉe, se la enhavo de la unua prop-o estas duba: *verŝajne li lernos pli diligente, ĉar alie li ne povos (povus) sukcesi ĉe l' ekzameno.*

Pseŭdo-subpropozicioj

Pseŭdo-subprop-oj oni povas nomi tiujn prop-ojn, kiuj estas enkondukitaj per **kiu**, do ŝajnas rilataj subprop-oj, sed ne anstataŭas frazelementon de la antaŭa prop-o. Tiaj subprop-oj rilatas al la *tuta* antaŭa prop-o kaj asertas ion pri ties enhavo. Oni povas ilin rekoni per tio, ke ili estas

transformeblaj en prop-ojn kopulajn, enkondukitajn per **kaj tio**; aŭ en tute memstarajn frazojn, enkondukitajn, post punkto, per **tio**.

Ekzemploj: *pro via fuŝo mi devas komenci ĉion de antaŭe, kio estas (kaj tio estas) ege malagraba por mi; li parolas perfekte, kio estas vere miriga, ĉar nur antaŭ nelonge li eklernis la lingvon; li faras ĉion laŭ sia propra kapo, kion oni ne povas laŭdi, ĉar li estas stultulo*. Kp. § 58. B. 2.

Same estas ankaŭ pri la prop-oj enkondukitaj per la rilat-adjektiva **kiu**: *ili eble rifuzos, ĉe kiu okazo (= kaj ĉe tiu okazo) ni devas jam difiniani sintenon*. Kp. § 81.

Rim. Pseŭdo-subpropozicioj oni povas rigardi ankaŭ tiujn rilatajn subpropoziciojn, kies enkonduka **kiu** reprezentas iun frazelementon de la antaŭa frazo, kaj tamen la propozicio ne difinas aŭ karakterizas tiun, sed donas pri ĝi ian krom-informon: *la policano kure atingis la murdinton, kiun li katenis; li skribis longan leteron, kiun li sendis al ŝi*. La diferencon disde la vera rilativa subpropozicio oni vidas klare, komparante jenajn du frazojn: *li forfetis la harpon, kiu tintis tiel harmonie sub ŝiaj fingroj kaj: li forfetis la harpon, kiu eligis ĝeman sonon kaj rompiĝis*. La konfuzon oni povus eviti, aldonante ĉiam post la pseŭdo-rilativo unu tempan adverbeton: *kiu tuj... kiu tamen... kiu baldaŭ...* Sed eble estus konsilinde tiajn propoziciojn ligi per **kaj** (... atingis la murdinton kaj lin katenis...; forfetis la harpon kaj ĝi eligis...), precipe, kiam la subprop-a verbo estas pasiva: ĉar tiam la temposinsekvo facile ŝajnus absurda; anstataŭ: *li instruis en tiu sama lernejo, de kiu li estis elpelita*, oni skribu: ...lernejo, kvankam li estis antaŭe elpelita el ĝi. Same, anstataŭ: *la novan aŭton stiris mia frato, kiu estis mortigita ĉe kolizio*, skribu: ...mia frato; li estis mortigita...

Rekta parolo

227

Se ies vortojn oni citas precize kiel tiu ilin diris, tio estas la **r e k t a p a r o l o**. En la rekta parolo oni distingas:

1. Frazon *citantan*, kiu indikas la parolanton kaj la manieron de la parolo (diris, demandis, ordonis, petis, kriis ktp.).
2. Frazon aŭ frazojn *citatajn*, kiuj ripetas laŭvorte, senŝanĝe la parolon mem.

La *citanta frazo* povas esti antaŭmetita, intermetita, postmetita. *Antaŭmetitan* sekvas dupunkto. *Intermetitan* povas ĉirkaŭfermi haltostrekoj (—), aŭ komoj, precipe se la citata parolo estas metita inter citiloj. *Postmetitan* antaŭas haltostreko aŭ komo (post ferma citilo). Kelkfoje oni uzas simplan komon ankaŭ sen citiloj (precipe svedoj).

La *vortordo* en la inter- kaj postmetitaj frazoj citantaj tenas sin, laŭ la kutimo de Z. kaj aliaj aŭtoroj, al la jena regulo:

La predikato antaŭas la subjekton, se la subjekto estas substantivo; sed la vortordo estas seninversa, se la subjekto estas pronomo persona.

En noveloj kaj romanoj ofte mankas la citantaj frazoj dum dialogo, se la persono de l' parolantoj estas evidenta el la antaŭaĵo.

La *citata(j)n frazo(j)n* oni metas inter citiloj, aŭ — en noveloj — oni komencas la alineon per halto-streko (—) kaj oni alineas ĉe la fino de

la citaĵo.

Ekzemploj:

"Absolute nenio", estis la respondo de la advokato^Z.

"Kelkajn centojn da funtoj?" diris la kliento. "Kaj mi foruzadis milojn!"^Z.

"Ho, jes", ŝi respondis kun gaja rido...^Z

"Ligita", li serioze aldonis, "kun fingringo"^Z.

★★★

– Miaj sinjoroj, – ŝi ekparolis, – tre urĝa afero devigas min veni ĉi tien...

– Ajla! – ripetis la virino surprizite, – kial?

– Vin fetu sur la hundon! – furioze ekkriis la gvardiano. Omar daŭrigis:

– Vi konas la kaŭzon de mia malĝojo...

B. SUBORDITAJ PROPOZICIOJ

Difino

228

Dum ĉiu kunordita prop-o estas aparta frazo, kun memstara senco, la subordita prop-o aŭ *subpropozicio* estas nur kompletiga parto de la ĉefprop-o, t.e. frazelemento esprimita en formo de tuta prop-o. Sekve, ekzistas tiom da specoj de subprop-oj, kiom da specoj de frazelementoj: do subjektaj, objektaj, predikativaj, epitetaj, adjektaj. Ĉiu respondas al la sama demando, al kiu la frazelemento de ĝi anstataŭata. Kaj – pli aŭ malpli facile – ĉiun oni povas esprimi ankaŭ per frazelemento:

Ekzemploj:

S u b p r o p - o o b j e k t a: *mi antaŭdiris al li, ke la afero ne sukcesos.* (*Kion mi antaŭdiris? Ke la afero ne sukcesos; la nesukceson de la afero.*)

S u b p r o p - o e p i t e t a: *ne ekzistas potenco, kiu povus nin disigi.* (*Kia potenco? Kiu povus nin disigi; povanta nin disigi.*)

S u b p r o p - o a d j e k t a: *li rikoltas eĉ, kie li ne semis.* (*Kie li rikoltas? Eĉ kie li ne semis; eĉ en loko ne prisemita de li.*)

En la ĉefprop-o ofte troviĝas pronomo montranta al la subprop-o (**tio, tiu, tia, tial, tiel, tiam, tie** ktp.). Multfoje oni ellasas ilin, kelkfoje ili estas nepre konservendaj.

Rim. Ĝenerale, oni povas eldiri la regulon, ke tiu ĉefprop-a demonstrativo estas ellasbla, se ĝi havas la saman kazon aŭ prepozicion kiel la subprop-a rilatpronomo; en mala okazo oni devas ĝin konservi. Ekzemplojn vd. sube ĉe la unuopaj subprop-oj.

Laŭ sia pozicio rilate al la ĉefprop-o, la subprop-o povas esti:

1. **a n t a ŭ m e t i t a:** *ĉar vi ne venis*, mi foriris.
2. **p o s t m e t i t a:** mi scias jam, *kion mi faru*.
3. **i n t e r m e t i t a:** la homon, *pri kiu vi parolas*, mi neniam vidis.

La subprop-ojn oni povas dividi en tri grandajn grupojn:

1. En subprop-ojn **k o m p l e t i v a j n**, kiuj anstataŭas subjekton, objekton, predikativon de ĉefprop-o.
2. En subprop-ojn **e p i t e t a j n**, kiuj anstataŭas epiteton de ĉefprop-o.
3. En subprop-ojn **a d j e k t a j n**, kiuj anstataŭas ĉefprop-ajn adjektojn (lokan, tempan, statan, modalan).

Sur la sekvantaj paĝoj ni studos detale tiujn tri grupojn de subprop-oj. Post tio, en aparta ĉapitro, ni pritraktos sistemege la uzadon de la verbo-tempoj en la subpropozicioj.

SUBPROPOZICIOJ KOMPLETIVAJ

Divido

La subprop-ojn kompletivajn aŭ k o m p l e t i v o j n oni povas dividi laŭ tri diversaj vidpunktoj:

229

I. Laŭ la *funkcio*, kiun ili plenumas rilate al ĉefpropozicio. El tiu ĉi vidpunkto oni distingas kompletivojn *subjektan*, *objektan* kaj *predikativan*. Krome tie ĉi oni povas loki ankaŭ la subpropoziciojn de koncernaj adjektoj, kiel *subprop-ojn de nereкта objekto*.

II. Laŭ la *formo*. Oni distingas

1. k o m p l e t i v o j n r i l a t a j n. Ili rilatas per *rilatpronomo* (kiu, kio, kia, solaj, aŭ en akuzativo, aŭ kun prepozicio) al la respektiva frazelemento, kiun ili anstataŭas, kaj kiu estas ofte anoncita en la ĉefpropozicio per demonstrativo (*tio, tiu, tia*). Ekzemple: *faru* (tion), *kion mi ordonis*; *vi ne sendis tion, pri kio mi vin petis*; *mi ne konas tiun, kiu alportis la leteron*; *kiu nenion havas*, (tiu) *nenion povas perdi*; *tiu, kiun vi sendis, ne alvenis*.

230

2. k o m p l e t i v o j n e k s p l i k a j n. Ilia subjunkcio estas *ke*. Dum la rilataj kompletivoj asertas ion pri la frazelemento, kiun ili reprezentas, la eksplikaj kompletivoj disvolvas ĝian enhavon. Ekzemple: *mi scias, ke li venos*; *ŝajnis, ke li min ne vidas*; *lia malfeliĉo estas, ke li nenion antaŭvidas*.

Rim. I. Z. uzas sisteme en indikaj subprop-oj la subjunkcion *kvazaŭ* anstataŭ *ke*, por emfazi, ke la indiko estas nereala; ekz-e: *ŝi mensogis ankaŭ al vi, kvazaŭ mi ŝin elvergis*; *ni ŝajnigu, kvazaŭ ni tute ne scias, kia homo li estas*; *li diras, ke la famo, kvazaŭ li ĉesis iam esti idisto, estas malvero*. En tiu ĉi speciala okazo do, oni povus uzi indikativon post la subjunkcia *kvazaŭ*. Tamen tia dirmaniero restis neimitita, eĉ de tiuj, kiuj uzas indikativon post la fiktiv-kompara *kvazaŭ* (vd. § 263), ĉar en la plej multaj lingvoj oni ne sentas la neceson de tia emfazo: la nerealecon ja sufiĉe esprimas la ĉefprop-a verbo (*mensogi, ŝajnigi* ktp.). Se tion oni tamen volas esprimi, oni prefere kombinas *ke* kun la adverba *kvazaŭ*, kaj diras ekz-e: *mi sentis, ke mia kapo kvazaŭ rompiĝis*; *ŝajnis, ke li kvazaŭ falis el la ĉielo*; *ili mensogas, ke la lingvo kvazaŭ estas objekto natura, organa*.

Kvankam la Zamenhofa uzado estas gramatike neatakebla, tamen pli konsilinde estas apliki la montritan anstataŭaĵon. Tiel nome oni povas meti la senesceptan regulon, ke la subjunkcia *kvazaŭ* ĉiam postulas kondicionalon. Male, se oni al-lasas du specojn de *kvazaŭ*-propozicioj (unu indikativan kaj unu kondicionalan), la distingo inter ili por multaj povas esti iom subtila, kaj cetere ne alportas ion nepre necesan.

Tiaj eksplikaj kompletivoj povas esti implikitaj kun demandaj propozicioj aŭ subpropozicioj. Pri tio, vidu ĉi-sube punkton 4.

3. k o m p l e t i v o j n d e m a n d a j n. Ili konsistas el demanda propozicio, transformita en subpropozicion per *tio*, ke oni ĝin dependigas je propozicio alia. Ekzemple, la frazoj *kiam li venos? Mi ne scias* iĝas: *mi ne scias, kiam li venos*. Kiel la demandoj esprimitaj en memstaraj prop-oj, ili povas esti

a) *tutecaj*, kiam oni demandas pri la tuta frazo. La subjunkcio estas ĉu. Ekzemple: *skribu al mi, ĉu vi venos; ne estas certe, ĉu li faris sian taskon.*

b) *partecaj*, kiam oni demandas pri unu vorto: pri la demanda partikulo. La subjunkcioj povas esti ĉiuj demandaj vortoj de la Tabelo (solaj, aŭ en akuzativo, aŭ kun prepozicio). Ekzemple: *ne estas certe, kiu estas kulpa pri ĉi tio; ne estas klare, kion vi volas de mi; mi ne scias, kie li estas; mi divenis, kies intrigo tio estas; li ne volis diri, kiom kostis la donaco; neniu komprenis, pri kio li parolas.*

Krome, la dependaj demandoj povas esti ankaŭ *kompleksaj*, kunmetitaj el du propozicioj. *Partecajn* demandojn oni ligas per *kaj*, *tutecajn* per *kaj*, se ili estas kopulaj, per *aŭ*, se ili estas alternativaj. Ekzemple: *mi ne scias, kie li estas kaj kion li faras; demandu lin, ĉu mi iru tien kaj ĉu mi kunportu ion necesan; mi volus scii, ĉu mi devas tuj fari la aferon, aŭ mi povas ĝin prokrasti ĝis morgaŭ.*

La demandaj kompletivoj ĝenerale ne estas anoncitaj per demonstrativo en la ĉefpropozicio. Ili neniam estas ligitaj per *ke*.

Rim. II. La partecaj demandoj kompletivaj povas esti tre similaj al kompletivoj rilataj. Rimedo de distingo estas tio, ke la kompletivojn rilatajn oni povas transformi en frazelementon faritan el la *predikato* de l' kompletiva subpropozicio, dum la partecajn demandojn oni povas transformi en frazelementon faritan el la *subjunkcio* de la dependa demando.

Ekzemple: *faru, kion mi ordonis* (mian ordonon); *mi ne konas tiun, kiu alportis la leteron* (la leter-alportinton); *li estas, kiu vin savis* (via savinto) [kompletivoj rilataj].

Mi ne scias, kion li ordonis (la "kioecon" de lia ordono); *mi ne scias, kiu alportis la leteron* (la "kioecon" de la alportinto); *li ne skribis, kiam li venos* (la kiamon de lia veno); *li demandis, kial ŝi ploras* (la kialon de ŝia ploro) [dependaj demandoj].

Aliparte, dependa demando povas simili ankaŭ al adjekta subprop-o. Oni distingas per tio, ke dependan demandon oni povas transformi en frazelementon subjektan, objektan aŭ predikativan, laŭ tio, kiun ĝi reprezentas, dum adjektan subprop-on oni transformas en la respektivan adjektan frazelementon: *li skribis al mi, kiam li venos* (la kiamon de lia veno: dependa demando); *mi skribis, kiam li venis* (en la tempo de lia veno: adjektprop-o tempa).

Malgraŭ la samformeco de la rilatpronomoj kun la demandaj vortoj, la konfuzon plej ofte forigas la verbotempoj, kiuj en la rilataj kaj adjektaj subprop-oj estas absolutaj, dum en la dependaj demandoj ili estas relativaj (vd. § 261, 271). Kelkfoje tamen povas esti momenta konfuzo. Ekz-e, la frazon: *rigardu tra la fenestro, kiu estas tie* – oni povas kompreni unuavide jene: *rigardu tra la fenestro estanta tie*. Por nepriigi la komprenon de dependa demando, oni povas sin helpi metante *do* post la demandvorto (vd. § 217, Rim.); post rilatpronomo ja neniam staras *do*: *rigardu tra la fenestro, kiu do estas tie*; aŭ per enmeto de objekto: *mi skribos la daton, kiam li venos*. La adjektecon de la subprop-o oni povas certigi per ĉefprop-a adjekto: *mi skribis en la tempo, kiam li venis*.

Rim. III. Ĉe kompletivoj rilataj, pedanta analizo povus rigardi la demonstrativon vera frazelemento (subjekto, objekto, predikativo), kaj la kompletivon mem rilata

prop-o kun la valoro de epiteto: *faru tion, kion mi ordonis* (kian tion? tian, kian mi ordonis). Sed la supra analizo estas pli konforma al la reala irado de la penso.

4. **k o m p l e t i v o j n i m p l i k i t a j n.** En multaj lingvoj ekzistas tia frazkonstruo, ke la eksplika kompletivo estas interplektita kun demanda propozicio aŭ subpropozicio (epiteta aŭ adjekta), tiel ke du prop-oj kvazaŭ reciproke subordiĝas unu al la alia. Tiaokaze, nome, la demand-vorto aŭ la subjunkcio de la unua prop-o estas samtempe la objekto aŭ adjekto de la dua: *kiel vi deziras, ke mi agu? Mi ne scias, kion vi volas, ke mi faru.* Videble, en la dua frazo, "kion" havas du funkciojn: ĝi, kiel rilativo, subordiĝas sian prop-on al la ĉefprop-o "mi ne scias", kaj, samtempe, ĝi estas ankaŭ la objekto de la verbo "faru" de la sekvanta prop-o: *kion (vi volas, ke) mi faru?* Same dufunkcia estas "kiel" en la unua frazo: *kiel (vi deziras, ke) mi agu?*

En la dua eldono ni malaprobis tiajn frazojn kiel nekorektajn. Sed, rekonsiderante la aferon laŭ instigo de s-ro de Hoog kaj ankaŭ baze de trovitaj zamenhofaj ekzemploj, ni nun prijuĝas ilin malpli severe: ili ŝajnas allaseblaj en la sekvantaj okazoj:

a) post verboj de sensado: *kion vi aŭdis, ke oni diras pri tio?; uzu ĝin nur en tiuj okazoj, kie vi vidas, ke ĝi estas efektive necesa*^Z. Ĉi-okaze, tamen, pli simpla estas frazkonstruo kun infinitivo aŭ predikativo: *kion vi aŭdis diri pri tio?... kie vi vidas ĝin efektive necesa.*

b) post verboj, post kiuj infinitivan konstruon oni povas uzi nur ĉe la subjekt-sameco de la du verboj (ekz-e *mi esperas ricevi; mi volas, deziras, intencas sendi...* ktp.), kaj ĉe kiuj oni per la kompletiv-impliko povas sin helpi, kiam la dua ago havas alian subjekton: *kion vi esperas, ke oni donacos al vi?; kiun vi deziras, ke mi liberigu al vi?* (Evangelio laŭ Mateo); *agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras, ke oni agu kun vi*^Z. Efektive, en tiaj okazoj estas tre malfacile trovi alian frazturnon.

Neallasebla ŝajnas la impliko post la verboj de sciigado (ekz-e: *kiu diras la homo, ke mi estas? La homo, kiun vi asertis, ke vi vidis, estas delonge mortinta*). Tiaokaze oni devas alie turni la frazon: *kion diras la homoj (pri tio), kiu do mi estas? La homo, pri kiu vi asertis, ke vi vidis lin...* Kp. *donu tiun porcion, kiun mi donis al vi, kaj pri kiu mi diris al vi, ke vi retenu ĝin ĉe vi*^Z.

Same neallasebla ĝi estas post la verboj de sciado; anstataŭ: *ekzistis neniu fajrejo, kie ŝi ne sciis, kio estas kuirita*, oni diru: *ekzistis neniu fajrejo, pri kiu ŝi ne sciis, kio estas kuirita sur ĝi*^Z. Same: *li metis Urijan sur la lokon, pri kiu li sciis, ke tie estas la plej fortaj viroj*^Z; *rifuzi tiun ĉi honoron al Hillel, pri kiu s-ro D. scias tre bone, ke li estis unu el la plej piaz saĝuloj*^Z.

Esplorinte la suprajn frazojn, oni vidas, ke en la allaseblaj implikoj la antaŭa prop-o havas gramatikan sencon ankaŭ en si mem (*kion vi aŭdis... kion vi esperas... kiun aŭ kiel vi deziras...*), sed en la frazoj, kiuj ŝajnas al ni nekorektaj, tiu antaŭpropozicio estas gramatika stumpo: *kiu diras la homoj... (diri postulas objekton!); ... kiun vi asertis*

(oni ja ne asertas *iun!*). Ĉi tiun senckompletecon de la antaŭa propozicio oni do povas eĉ uzi kiel indikilon pri la ĝusteco de la frazo. Alivorte, la implikita kompletivo estas ĝusta, kiam la demandvorto aŭ subjunkcio de la antaŭa propozicio apartenas sence al ambaŭ prop-oj. Ĝi estas malĝusta, kiam la demandvorto aŭ la subjunkcio rilatas per sia senco nur al la kompletivo.

231

III. Fine oni povas dividi la kompletivojn laŭ la *modo* de ilia predikato.

1. Kompletivoj indikaj.

Ili simple asertas aŭ eksplikas ion faktan. Modo: indikativo: *mi vidis, ke li falis*.

2. Kompletivoj celaj.

Ili indikas ion, kies eventualan plenumiĝon aŭ neplenumiĝon iu aŭ io celas aŭ iel por tio efikas. Ili havas u-modon. Kompletivojn celajn oni trovas nur eksplikajn (ke) aŭ demandajn (ĉu, demandaj Tabelvortoj), rilatajn neniam.

Oni povas distingi du specojn de kompletivoj celaj:

A) la celadon, ordonon, aspiron esprimas sole la predikato de la subprop-o; la predikato de la ĉefprop-o ne havas tian sencion. Tiaokaze la u-modo estas sence necesa, ĉar indikativo havus alian sencion (*mi diris, ke li venos. Mi diris, ke li venu*). En tiaj subprop-oj do la u-modo aldonas al la senco de la ĉefpredikato la sencion de volo por io. Ilin oni povas nomi subprop-oj *volaj*. Ekzemploj: *mi avertas vin, ke vi ne iru tien* (mi avertas vin, ke la vojo estas danĝera); *mi avertas vin, ke vi faru urĝe la aferon* (mi avertas vin, ke la afero estas urĝa); *mi skribis al li, ke li ne venu* (mi skribis al li, ke mi ne deziras lian venon).

B) la celadon, ordonon, aspiron, efikon esprimas jam la predikato de la ĉefprop-o. Tiaokaze la u-modo ne estas sence necesa, ĝi estas nur sintaksa dependaĵo de la ĉefprop-a predikato. Ekzemple: *mi permesis al li, ke li promenu*. Ĉar tiaj prop-oj esprimas ĉiam la *efikon* de la ĉefprop-o por la efektiviĝo aŭ ne-efektiviĝo de ia celo, oni povas nomi ilin subprop-oj *efikecaj*.

La efikeca u-modo estas ligita al certaj ĉefprop-aj verboj aŭ predikativoj. Tiaj estas, kiuj esprimas:

a) *v o l o n, d e z i r o n*: *mi ne volas, ke vi foriru; mi deziras, ke vi restu*.

b) *a d m o n o n, k o n s i l o n*: *la patro admonis sian filon, ke li lernu pli diligente; kio vin instigis, ke vi faru ĉi tion?; li konsilis, ke mi evitu tiun vojon; mi proponas, ke ni laboru kune*.

c) *p e t o n, p o s t u l o n*: *li petis, ke mi lin vizitu; ne pretendu, ke oni donu al vi ĉion; li postulas, ke oni lin respektu*.

d) *o r d o n o n*: *Cezaro ordonis, ke oni faru ponton*.

e) *d e v i g o n, d e v i g a n o r d o n* de cirkonstancoj: *vi ne povas min devigi, ke mi faru tion kontraŭ mia volo; mi bezonas, ke oni min helpu; estas necese, ke ni interkonsentu; dependas nur de li, ĉu li restu aŭ ne; li trudis al mi, ke mi faru tion*.

f) ebligon, permeson kaj ties malon: *li ne lasis, ke la infanon oni forprenu de la patrino; multaj malfacilaĵoj malebligis al ni, ke ni efektivigu nian intencon; tio ebligis, ke mi plenumu mian promeson; la vetero malhelpis, ke ni forveturu; kiu permesus, ke oni dancu sur lia dorso?; mi malpermesas, ke vi iru tien; li helpis, ke mi atingu la celon.*

g) klopodon por io, aŭ ties malon (evito): *multe li klopodis, ke ili interpacigu; ĉu vi ne volas akceli, ke la afero prosperu?; ĉiamaniere li evitas, ke ni renkontigu.*

Rim. I. Post *esper*i kaj *tim*i sekvas indikativo: *mi timas, ke vi falos; mi timas, ke ni vojeraris; mi esperas, ke li venos.* Z. uzas kelkfoje post *tim*i volitivon kun **ne**: *mi timas, ke li ne rakontu tion al iu; kvazaŭ ŝi timus, ke tiu virino ne foriru de ŝi.* Tiu latinismo estas eble pravigebla per tio, ke oni subkomprenas deziron (*mi time deziras, ke li ne -u*). Sed ĝi ne trovis imitantojn kaj estas prefere evitinda. Vd. sube Rim. VII.

Rim. II. Post *gard*i *sin* kaj *atent*i la volitivon klarigas, ke tie ĉi oni elipsas **por**, do temas pri prop-oj celadjektaj: *gardu vin, (por) ke vi ne falu; atentu, (por) ke ni ne vojeraru.*

Rim. III. Post *dec*i, *plaĉ*i, *estas bone* oni uzas indikativon, kiam tiuj verboj esprimas juĝon pri fakta afero: *ne decas, ke vi iris tien seninvite; ne plaĉas al mi, ke vi nenion faras; estas bone, ke vi tion aranĝis.* Sed se la subprop-a ago estas futura, *dec*i havas la sencon de konsilo, do oni uzas volitivon: *ne decas, ke vi iru tien.* Post *plaĉ*i kaj *estas bone* oni povas uzi same volitivon, sed tio estas malpli kutima; plejofte oni metas la ĉefpredikaton en futuron aŭ kondicionalon, kaj la subprop-on oni ligas per **se**: *ne decus, se vi irus tien; ne plaĉos al mi, se vi faros tion; estos (estus) bone, se vi venos (venus) kun mi.*

Post *mer*i*t*i sekvas indikativo, se ĝi signifas faktan akiron per merito: *li meritas, ke oni lin honoris.* Volitivo sekvas, se la akiro estas futura aŭ fiktiva: *li meritas, ke oni lin honoru; tiu artaĵo meritis, ke vi estu ĝia elpensinto*².

Post *man*k*i* sekvas indikativo, se ĝi signas ne-havon aŭ ties senton: *tre mankis al ni, ke vi ne ĉeestis.* Sed sekvas volitivo, se ĝi havas la signifon de neceseco, dezirateco; en tiu ĉi okazo la subprop-o ne estas negacia: *nun mankas ankoraŭ, ke ni subskribu la kontrakton; nun mankas ankoraŭ, ke ni fariĝu virinoj!*²

Post *atend*i oni povas uzi volitivon, se oni volas akcenti la *deziron* je tio, kion oni atendas: *li atendis, ke ŝi eliru.* Ĉe simpla atendo sekvas indikativo; nur indikativo uzeblas, se la subsenco estas "opinii": *mi jam atendis, ke la domo falos sur min.* Ĝisatendon esprimas tempa ĝis-propozicio: *atendu, ĝis mi venos; ŝi atendis, ĝis li eliris; atendis, atendis, ĝis lin ĉerko etendis*².

Post *sufiĉ*i sekvas indikativo, se la subprop-o esprimas ekzistantan fakton: *sufiĉas, ke ekzistas tiuj veroj...*² Volitivon oni uzas, se ĝi montras la celon, por kio sufiĉas io = celadjekta subprop-o: *tio jam sufiĉas, (por) ke oni esploru la aferon*². Same: *se por la tutmondeco de ia lingvo estas sufiĉe, ke oni nomu ĝin tia...*² Se la subprop-a enhavo estas futura aŭ fiktiva, oni ĝin enkondukas per **se**: *sufiĉus, se vi dirus al li kelkajn vortojn; sufiĉos, se vi skribos kelkajn liniojn.*

Rim. IV. Post *kaŭz*i, *est*ig*i*, *rezult*i sekvas indikativo, dum post *ig*i, *fari* volitivo. Ĉi lastaj, nome, esprimas la efikon de io, dum la antaŭaj esprimas jam la definitivan rezulton de la efiko: *tio kaŭzis, ke la solvaĵo estis precipitata; tio estigis, ke li bankrotos; el tio rezultis, ke mi rezignis pri la afero* (vd. ankoraŭ § 398). Sed: *eĉ la plej forta deziro ne povis fari tion, ke menso ne-*

*instruita penetru en la misterojn de la scienco*².

Rim. V. Post *e b l i g i* oni trovas kelkfoje indikativon: *tio ebligis, ke mi nun ĉeestas*. Tio estas elipsa formo anstataŭ: *tio ebligis, ke (mi ĉeestu); mi nun ĉeestas*. Same, oni trovas kelkfoje indikativon post *n e m a l h e l p i*: *ĉio ĉi ne malhelpas, ke la libro estas interesa*. Nu, tiuj formoj, eĉ se ne nepre kondamneblaj, ŝajnas ne bonstilaj; oni uzu prefere volitivon, laŭ la uzo de Z.: *vi ne malhelpu, ke ŝi resanktigu la patran domon!*²

Rim. VI. Post ĉefpredikatoj signifantaj *k o n ' s i l o n*, *a d m o n o n*, *o r d o n o n* oni povas uzi *devas* en la subprop-o, anstataŭ u-modo: *la patro admonis la filon, ke li devas lerni pli diligente; li konsilis, ke mi devas eviti tiun vojon; Cezaro ordonis, ke oni devas fari ponton*. Tiaj formoj estas pravigeblaj per tio, ke la suprajn subprop-ojn oni povas rigardi nereкта parolo, kaj ordonon, konsilon, admonon oni povas esprimi same per *devas* kiel per u-modo: *Cezaro ordonis: "Oni faru ponton"*, aŭ: *"Oni devas fari ponton"*.

La diferenco inter la volaj kaj efikecaj subprop-oj montriĝas evidente, se oni provas transformi ilin en ĉefprop-ajn frazelementojn. Ĉe la *volaj* (A) tio ne estas ebla, ĉar tiel perdiĝas la senco de volo, ordono, efiko. Ekzemple, en la frazo: *mi diris al li lian venon* – nenio montras la *ordonon*. Tio evidente pravas, ke tie ĉi la u-modo havas propran, necesan funkcion. Male, ĉe la *efikecaj* prop-oj (B) la subprop-o estas transformebla en frazelementon sen ŝanĝo de senco: *Cezaro ordonis faron de ponto; li malhelpis nian trairon*. Tie ĉi do la u-modo havas nenian funkcion, ĝi estas pleonasma, sence superflua dependaĵo de la ĉefpredikato.

El tiu transformebleco sekvas, ke en kazo B la negativsenca ĉefpredikato transportas la negacion ankaŭ en la subprop-on: *li malhelpis nian trairon – li malhelpis, ke ni trairu*. Tio montras la *planan dependecon* de la subprop-a predikato. Nome, dismetinte la frazon en du memstarajn prop-ojn, oni devas meti *ne*: *ni ne trairis, li malhelpis tion*. Same: *li ne promenos, mi malpermesis tion; ni ne forveturis, la vetero malbligis tion*.

Tiuj efikecaj prop-oj do estas la sola okazo en E-o, en kiu la formo de la subprop-o ne dependas sole de la senco, sed ĝin grave influas la sintakso.* La sintakso postulas la sence superfluan u-modon, la sintakso donas negan senco al indika prop-o per la forta dependeco, kiun la subprop-o havas al la ĉefprop-o.

3. K o m p l e t i v o j s u p o z a j .

Ili esprimas, ke la subprop-a ago estas eventuala. Ni trovas ilin nur en

* Tiu efikeca u-modo do estas konforma al la *subjunktivo* de pluraj lingvoj. Ni tamen ne uzas tian terminon, ĉar la subjunktivo, kie ĝi ekzistas, estas multe pli vaste uzata (ĉe verboj de kredado, post *timi, esperi*, en nereкта parolo ktp.), dum la efikeca u-modo estas uzata sole kaj nure post la supregistrataj ĉefpredikatoj. Per la elimino de la termino ni volis malhelpi, ke oni vojeraru, uzante ĝin pli vaste, ol estas permesate en E-o.

eksplikaj kaj demandaj kompletivoj. Ilia modo estas kondicionalo (usmodo).

Ili subkomprenigas dugradan subpropozicion supozan kun *se: mi scias, ke li venus* (se li povus); *diru, kiom kostus tia vesto* (se mi farigus tian).

Rim. VII. Post *espero* kaj *timi* oni trovas kondicionalon ĉe Zamenhof, kiam tiuj verboj estas akompanataj de negacio: *ne esperante, ke tiu ĉi demando estus iam solvita pli bone*²; *ne ekzistas eĉ la plej eta kaŭzo por timi, ke aperus ia nova lingvo internacia, kiu elpuŝus Esperanton*². Tion komprenigas, ke oni emas tiokaze apogi la negacion per uzo de kondicionalo ankaŭ en la subpropozicio. Tio, cetere, estas analoga al la kondicionalo de rilataj epitetprop-oj post negacia ĉefprop-o (vd. § 239). La kondicionalo do ne dependas de *timi*, sed de la ĉefprop-a negacio. Same, en la frazo: *la titolo de majstro fortenas de E-o multajn, kiuj timas, ke fariĝinte e-istoj ili devus rigardi min kiel sian moralan ĉefon*² – la kondicionalo dependas de la supoza participadverbo (*fariĝinte* = se ili fariĝus). En la frazo: *mi timas, ke via indigno diktus al vi tro akrajn vortojn*² – la kondicionalo dependas de duagrada supoza subprop-o subkomprenata (se vi skribus al li leteron).

Rim. VIII. Post *se okazus* oni uzas kondicionalan eksplanan propozicion: *se okazus, ke Dio prenus al si ŝian animon*. Ties kaŭzo estas, ke la ĉefprop-o estas tie ĉi kvazaŭ pleonasma, kaj oni sentas aparteni la subjunkcion *se* rekte al la subprop-o.

Pri *la verbotempoj* en la kompletivoj vd. § 269-279.

En la sekvantaj paragrafoj ni esploros kelkajn specialaĵojn de la diversfunkciaj kompletivoj.

SUBPROPOZICIOJ SUBJEKTAJ

La subjekta subprop-o havas la saman funkcion rilate al la ĉefprop-o, kian la subjekto rilate al la predikato. Fakte, ĝi estas la vera subjekto de la ĉefprop-a predikato, sed ĝi estas esprimita en formo de tuta prop-o. Do ĝi respondas al la demandoj: *kio, kiu, kiuj* plus la predikato: *ŝajnas, ke li mortis* (kio ŝajnas? ke li mortis).

Oni distingus subjektprop-ojn eksplikajn, rilatajn kaj demandajn (subjektajn dependajn demandojn [vd. kompletivoj]).

I. Eksplika subjektpropozicio. Subjunkcio: *ke*.

Kelkfoje ĝin anoncas en la ĉefprop-o la demonstrativo *tio*, precipe kiam la ĉefprop-o estas demanda aŭ negacia: *ĉu tio estas vera, ke li mortigis sin?* Sed plejofte mankas la demonstrativo: *ŝajnas, ke la pluvo ĉesos; ne plaĉas al li, ke vi lin ne salutis* (kio ne plaĉas? tio, ke...); *el tio sekvas, ke la tuta afero estas fuŝita; min tedas, ke li parolas senĉese pri si mem; estas ĝojinde, ke vi venis; estas domaĝe, ke la bela plano fiaskis; ne malhelpas nin, ke li ne venis*.

La *modo* en la eksplikaj prop-oj povas esti:

a) **i n d i k a t i v o** (subprop-o indika). Tiajn prop-ojn oni trovas post verboj signifantaj: *ŝajni, aperi, montriĝi, plaĉi, ĝojigi, tedi, malhelpi, sekvi, okazi, rezulti* ktp. kaj speciale post *esti* kun predikativo: *estas grave, domaĝe, gratulinde, ĝojinde* ktp. (vd. la suprajn ekzemplojn). En

ĉi-lasta okazo la ĉefprop-a predikata adjektivo alprenas adverban formon: *bele estas, ke vi ne forgesis min* (bela estas tio, ke ...). Kelkfoje oni eĉ ellasas la kopulon *esti*: *domaĝe, ke li tute obstiniĝis; nekredeble, ke vi forgesis tion*. Kp. § 169 kaj sube Rim. IV.

Rim. I. Tian predikatan adverbon oni povus rigardi ankaŭ kvazaŭ substantiva formo de adjekto: tiaokaze ĝi estus la subjekto kaj la subprop-o estus predikativa. Kelkfoje oni uzas ankaŭ substantivigitan adjektivon, ekz.: *certo estas, ke...*

Rim. II. Kelkfoje oni ellasas *ke*, precipe post *ŝajnas*. La subprop-o ricevas la formon de ĉefprop-o kaj "ŝajnas" intermetiĝas inter komoj, kun preskaŭa valoro de adverbo: *la rikolto, ŝajnas, estos tre bona* (ŝajnas, ke la rikolto...).

b) v o l i t i v o (subprop-o vola-efikeca). Oni trovas ĝin post la predikativoj signifantaj: (*estas*) *grave, urĝe, necese, devige, bezone* ktp. kaj post ĉiuj pasivaj verboj, kiuj en sia aktiva formo sekvigus u-modan objektpropozicion (vd. § 231): *estas grave, ke vi iru tien kiel eble plej rapide; estas nepre necese, ke ni interkonsentu; ne estas permesate (estas malpermesate), ke infanoj legu tian libron; estas ordonite, ke oni estingu ĉiujn fajrojn*.

Post predikatoj, kiuj mem esprimas volon, intencon, efikon, oni uzas ĉiam u-modon (vd. § 231, 2. B.). Post predikatoj ne havantaj tian signifon, la modo dependas de la senco: *estas grave, ke li subskribis la dokumenton* (reala fakto); *estas grave, ke li subskribu la dokumenton* (deziro).

Estas eble povas havi du signifojn: 1. *povas esti*. Tiaokaze ĝin sekvas futuro: *estas eble, ke li venos*; 2. *estas ebligite*. Tiaokaze ĝi postulas volitivon: *fine estas eble, ke mi iom ripozu; nur hieraŭ estis eble, ke mi komencu la aferon*. Post *estas neeble*, same: *ne estas eble, ke li faris tian friponaĵon* (ne estas kredeble, ne povas esti); *ne estis eble, ke mi alvenu ĝustatempe* (ne estis ebligite de la cirkonstancoj).

Post *estas verŝajne, probable* neniam sekvas u-modo: *estas verŝajne, ke li venos*. Us-modo nur, se oni subkomprenas supozon: *estas verŝajne, ke li venus* (se li povus).

Post *estas dube*, oni trovas unu fojon ĉe Z. la volitivon: *estas tre dube, ke troviĝu iu, kiu entreprenus nun similan Sizifan laboron*; sed tion klarigas aparta unanco ("*ke devos troviĝi...*") la normala modo estas la indikativo: *estas dube, ke (aŭ: ĉu) li venos*.

c) k o n d i c i o n a l o (subprop-o supozaj). Tiaj prop-oj esprimas eventualecon kaj subkomprenigas duagradan subprop-on kun *se*: *estas eble, ke li venus, (se li povus); estas certe, ke li plenumus vian peton* (se vi lin petus).

Post kondicionalaj kaj futuraj ĉefprop-oj la subjunkcio povas esti *se*: *estus bone, se li venus; ne plaĉus al mi, se oni min rifuzus; estos utile, se vi helpos*. Vd. ankoraŭ: § 231, Rim. III. kaj § 257, I. 3.

Rim. III. Tiajn subprop-ojn kun *se* oni povus klasi inter la adjektaj (supozaj); sed tia analizo pli atentus la eksteran formon ol la internan signifon.

II. Rilata subjektpropozicio. Ĝi povas esti anoncita en la ĉefpropozicio per demonstrativo, tiu aŭ tio: *tiu, kiu diris tion al mi, mortis; tiuj, kiujn vi denuncis, venĝos al vi; tiu, kies portreton vi montris, estas mia fratino; tiu, per kiu vi sendis la leteron, estas perfidulo.*

Nur el la par-elementoj tiu-kiu, tiuj-kiuj, tio-kio oni povas ellasi la demonstrativon, precipe en arta stilo aŭ en proverboj: *bone ridas, kiu laste ridas; kio pasis, ne revenos.* Sed antaŭ akuzativa rilatpronomo konsilinde estas ĝin konservi (oni trovas tamen kelkajn ekzemplojn de ellaso, precipe en la poezio: *plenumiĝis, kion mi antaŭdiris*). Nekorekta estas la ellaso, se la rilatpronomo estas kies aŭ ĝin akompanas prepozicio. Ekzemple: *tiu, kies libron vi legas, estas mia preferata aŭtoro; tiu, kun kiu vi promenis, estas nekonata al mi.*

La modo estas indikativo aŭ kondicionalo, laŭ la senco: *tiu, kiu tion dirus, certe ne mensogus.*

Rim. IV. Se en la ĉefpropozicio troviĝas adjektivo predikata, ĝi ne alprenas adverbformon post la ellaso de la demonstrativo: *ne estas konsilinda, kio estigas konfuzon; ne povas esti komika, kio estas plorinda.*

III. Dependenda demando subjekta. Ilin kutime ne anoncas demonstrativo en la ĉefprop-o. Ili estas enkondukitaj de iu el la demandaj tabelvortoj (vd. kompletivoj) aŭ de la adverbo ĉu: *ne estas certe, pro kio li mortis; ne estas scieble, kio lin instigis al tia frenezaĵo; estas dube, ĉu li sciiĝis tion.* Kiel oni vidas, tiajn prop-ojn oni trovas ordinare nur post esti kun predikativo, kiu alprenas adverbformon same kiel ĉe la eksplikaj subprop-oj.

La modo povas esti

a) i n d i k a t i v o (vidu la suprajn ekzemplojn).

b) v o l i t i v o, kiam la subprop-o signas deziron, ordonon, efikon por io: *ne estas dirite, kiam ni iru; estas pripensinde, ĉu ni faru tian interkonsenton; de vi dependos, ĉu la mondo havu de nun pacon^Z.* Post la ĉefpredikato resti la u-modajn dependajn demandojn oni povas transformi en infinitivan konstruon: *la tuta kampo ŝajne estis jam okupita kaj ne restis jam, kie ricevi partizanojn^Z* (kie oni ricevu partizanojn).

c) k o n d i c i o n a l o, ĉe subkompreno de supozo: *estas dube, ĉu li povus fari tiun taskon* (se oni ĝin al li konfidus).

SUBPROPOZICIOJ OBJEKTAJ

La objekta subprop-o havas la funkcion de ĉefprop-a objekto. Fakte ĝi estas la vera objekto de l' ĉefprop-a predikato, sed esprimata en formo de tuta prop-o. Ĝi respondas do al la demandoj: **kion, kiun, kiujn** plus subjekto plus predikato ĉefprop-aj: *mi ne sciiĝis, ke li estas malsana* (kion mi ne sciiĝis? ke li...).

Oni distingas tri specojn de objektprop-oj: eksplikajn, rilatajn kaj dependajn demandojn.

I. Eksplika objektpropozicio. Konjunkcio ke.

Nur en tre maloftaj okazoj ilin anoncas demonstrativo ĉefprop-a (**tion**), nome, kiam oni volas insisti pri l' aserto: *ĉu tion vi diras, ke li perfidis nin?* Plej ofte mankas la demonstrativo: *mi scias, ke li estis malsana.*

La modo povas esti:

a) i n d i k a t i v o. Tiajn prop-ojn oni trovas post la verboj de *sciado* (*scii, koni, antaŭvidi, aŭdi, vidi*), *sciigado* (*diri, aserti, anonci, informi, deklari, montri, indiki, instrui, konkludi, skribi, telefoni*), *kredado* (*kredi, supozi, konjekti*), *sentado* (*timi, esperi, ĝoji, bedaŭri*), *rezultado* (*estigi, kaŭzi, rezultigi*) ktp.

Rim. I. Kelkfoje, precipe en rapidaj dialogoj, oni ellasas la subjunkcion **ke**: *mi diras al vi, ŝi ricevos enterigon kristanan*². Tiaokaze, oni ofte intermetas la ĉefprop-on kaj la subprop-o ŝajnas sendependa: *la feliĉo, mi scias, ne daŭras longe; via ofero, kedu, ne estos vana* (mi scias, ke la feliĉo...; kedu, ke via ofero...).

Pri *ebligi* kaj *ne malhelpi* vd. § 231, 2. B. Rim. V.

Pri u-modo kun **ne** post *timi* vd. § 231, 2. B. Rim. I.

Pri *kvazaŭ* anstataŭ **ke** vd. § 230, Rim. I.

Post la verboj de *sensado* (*vidi, aŭdi, aŭskulti, percepti*) oni povas transformi la subprop-on tiel, ke ĝian predikaton oni metas en infinitivon kaj ĝian subjekton en akuzativon (*akuzativo kun infinitivo*). Tiu akuzativo estas samtempe la objekto de la ĉefprop-a predikato: *mi vidis lin ŝteli* (ke li ŝtelas); *ili aŭdis la birdojn trili* (ke la birdoj trilas). Vd. Atribuado (§ 171).

La samajn formojn post *igi, lasi, malhelpi* vidu poste.

Oni povas tiajn formojn anstataŭigi ankaŭ per objekta predikativo (*mi vidis lin ŝtelanta; ili aŭdis la birdojn trilantaj*), sed tia konstruo, same kiel la prop-a kun **ke**, estas pli peza.

Rim. II. Se la predikato de l' subprop-o havas objekton, ĉe infinitiva transkonstruo tiu objekto devas stari nepre post la infinitivo, ĉar male oni riskus konfuzon kun la subprop-a subjekto (same akuzativforma): *mi vidis lin skribi la leteron*. Vd. ankoraŭ § 180 kaj sekv.

b) v o l i t i v o (volaj efikecaj objektprop-oj). Oni trovas ĝin:

1. post verboj de sciigado, kiam oni subkomprenas ideon pri volo, ordo (subprop-o vola): *li sciigis al mi, ke mi venu; li skribis al sia frato, ke li pagu siajn ŝuldojn* (skribe ordonis).

2. post verboj de celado, volado, ordono, peto, efikado por aŭ kontraŭ (vd. § 231, 2. B.): *mi volas, postulas, ordonas, konsentas, permesas, devigas, pretendas, deziras, petas, admonas, konsilas, bezonas, malhelpas, ne malhelpas, helpas, ebligas, malebligas, akcelas, klopodas, volas eviti, ke li venu*.

Oni povas uzi infinitivan konstruon post la ĉefprop-aj predikatoj *igi, lasi, malhelpi, helpi* (vd. supre sub a. 6-a alineo): *mi igis lin veni; mi lasis ĝin fali; vi malhelpas min legi; lasu ŝin dormi* (mi igis, ke li venu; lasis, ke ĝi falu; vi malhelpas, ke mi legu; lasu, ke ŝi dormu); *homoj, kies interna indo, se ni pli profunde volus rigardi, devus nin igi ruĝiĝi antaŭ ili!*²

Rim. III. Ankaŭ tie ĉi validas la konstruo montrita supre (a. Rim. II.): *la malsato igis la sieĝatojn manĝi la ĉevalojn; li igis la ĉevalon manĝi la fojnon; la ankoraŭ ne sufiĉe forta stato de nia afero igis min repreni miajn proponojn^z; venki la indiferentecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponatan lingvon^z.*

c) **k o n d i c i o n a l o** (objektprop-o supoz). Ĉe ĝi oni subkomprenas supozon kun **se**: *mi kredas, ke tio plaĉus al li* (se li ĝin vidus). En ĉiuj aliaj okazoj, sen tia supozo subkomprenata, la us-modo estas neaprobebla.

Rim. IV. Pri kondicionalo post *timi* vd. § 231, Rim. VII. Nemotivebla, do neuzinda estas la kondicionalo ĉe la ĉefpredikatoj *ebligi, malebligi, malhelpi*.

II. Rilata objektpropozicio. Ĝin regule anoncas ĉefpropr-a demonstrativo (**tion, tiun, tiujn**): *faru tion, kio al vi plaĉas; alportu tion, kion mi petis; mi ne konas tiun, kiu alportis la leteron; mi ne konas tiujn, kies nomojn vi menciis.*

Nur el la par-elementoj **tion-kion** oni povas ellasi la demonstrativon: *faru, kion mi ordonis.* Ĝin ellasi antaŭ **kio** (*vi ne sendis, kio al mi necesas*) estas malpli konsilinde. La ellaso de **tiu(j)n** antaŭ **kiu(j)** estas nekorekta.

Rim. V. Oni povas trakti kiel rilatajn ankaŭ subprop-ojn enkondukitajn per **kio ajn, kiu ajn**: *mi akceptos, kion ajn vi volas.* Tiaj prop-oj jam estas parencaj al la koncedaj (vd. § 258).

III. Dependenda demando objekta. Ĝi povas esti simpla aŭ kompleksa, parteca aŭ tuteca (vd. § 230, 3.). Partecan demandon enkondukas iu tabelvorto (**kiu, kia, kio, kiel, kial, kiam, kiom, kies**): *mi ne scias, kiu li estas; li ne diris, kian rimedon li uzis; oni raportis al mi, kio okazis; mi ne konjektas, kion vi deziras; li ne volas diri, kiom kostis la donaco; li ne skribis, kiel li fartas; li demandis ŝin, kial ŝi revenas tiel frue; mi ne rekonas, kies ĉapelo ĝi estas; mi aŭdis, kiel oni fermas brue la pardon.*

La demandaj vortoj povas kombiniĝi kun prepozicio: *neniu scias, de kie li venis; la polico esploris, de kiam li restadas en la urbo; mi ne scias, ĝis kiam li restos tie ĉi.* Anstataŭ **dum kiam** oni diras kiel **longe**: *li precize elkalkulis, kiel longe daŭros la laboro.* Tutecan demandon enkondukas **ĉu**: *skribu al mi, ĉu vi venos; oni esploras, ĉu la rivero estas sufiĉe profunda por ŝipoj.* Pri kompleksaj demandoj vd. § 230, 3.

La demandaj subprop-oj neniam estas anoncitaj per demonstrativo kaj estas ligitaj ĉiam sen **ke**. Pri ilia distingo disde la *rilataj* kaj *adjektaj* subprop-oj vd. § 230, Rim. II.

La modo en la demandaj subprop-oj objektaj povas esti:

a) **i n d i k a t i v o.** Tiajn subprop-ojn oni trovas post la verboj de sciado aŭ sciigado (vd. la suprajn ekzemplojn).

Rim. VI. Post scii oni povas trovi elipsajn demandojn: *li volis aĉeti poŝhorloĝon, kaj jam li sciis kian* (sk. li aĉetos); *ŝi havis la senton, ke unu (floro) inter ili mankas, ŝi nur ne sciis kia^z* (sk. mankas). Kiel oni vidas, oni uzas ĉe la tabelpronomo la kazon postulatan de la subkomprenita verbo.

Ankoraŭ pli elipsaj estas jenaj esprimoj, kiujn oni trovas sub formo de intermetitaj sendependaj propozicioj: *mi ne scias, Dio scias, diablo scias, kiu scias*. Ekzemple: *oni bezonas ankaŭ geografion kun kaligrafio kaj kun mi ne scias kio ankoraŭ^Z; tio estas Dio scias kia kaprico; el tio povas alveni la diablo scias kio^Z; tio estus kiu scias beno aŭ malfeliĉo.* (G.W.)

b) **v o l i t i v o.** Ĝi indikas, ke la pridemandata afero okazas pro ies volo: *li demandis min, kiam li revenu* (kiam mi volas, ke li...); *li ne diris, ĉu mi iru mem aŭ mi sendu iun alian* (ĉu mi devas iri...); *diru, kiel mi konduku* (kiel mi devas...); *mi ne sciis, kion mi faru.*

Post la ĉefpredikato *scii* la u-modajn dependajn demandojn oni povas transformi en infinitivan konstruon, se la subjektoj identas: *oni ne sciis kiel aranĝi la aferon* (kiel oni aranĝu); *li ne scias kion fari* (kion li faru); *mi ne scias de kie preni la monon por tio.*

Infinitiva konstruo estas ebla ankaŭ post *montri, havi kaj instrui*: *mi montros al vi kiel ligi la nodon; instruu min kiel konduki en tia societo; ŝi ne havis per kio aĉeti lignon^Z.*

c) **k o n d i c i o n a l o,** ĉe subkompreno de supozo: *mi ne scias, kiom kostus tia festo* (se mi ĝin aranĝus); *mi ne komprenas, kial li kolerus* (se li kolerus).

NEREKTA PAROLO

234

Speco de objekta subprop-o estas la nereкта parolo. Tiel oni nomas frazturnon, per kiu oni citas ies parolon en formo de dependa prop-o. La ĉefprop-o indikas, kiu estas la parolinto, la subprop-o indikas, kion li diris.

Por transformi rektan parolon (vd. § 227) en nerektan, oni ĝin enkondukas per ke kaj transformas ĉiujn pronomojn personajn aŭ posedajn de unua aŭ dua persono en pronomojn de tria persono. Sed oni ŝanĝas nek la tempojn, nek la modojn de la cititaj prop-oj. Ekzemple:

Rekta parolo:

Li diris: mi estas laca.
Li riproĉis: se vi estus homoj
vi donus al mi akvon.
Mi ne demandis lin: de kie
vi estas?
Ili ne sciis: trafos ilin malbono.

Nerekta parolo:

Li diris, ke li estas laca.
Li riproĉis, ke, se ili estus homoj,
ili donus al li akvon.
Mi ne demandis lin, de kie
li estas^Z.
Ili ne sciis, ke trafos ilin malbono^Z.

Oni vidas la diferencon inter nerekta parolo kaj objektprop-o indika. Ĉar la parolinto povis diri unu aŭ plurajn frazojn, kun kompleksaj kaj malsamaj prop-oj, la nerekta parolo povas konsisti ankaŭ el pluraj prop-oj kun plej diversaj tempoj kaj modoj, kun plej diversaj konjunkcioj kaj subjunkcioj. Kaj, laŭ la severa analizo, la vera objekto de la ĉefpredikato tiaokaze ne estas unu subprop-o, sed la tuto de l' nerekte citita parolo.

Rim. I. Si kaj sia rilatas ĉiam al la subjekto de la subprop-o, en kiu ili staras: *li plendis, ke lia amiko ne redonis al li lian libron* (rekte: *li plendis: mia amiko ne redonis al mi mian libron*). Kontraŭe al la kutimoj de kelkaj lingvoj, si kaj sia rilatas al la subjekto de la ĉefprop-o nur, se ĝi identas kun la subprop-a subjekto: *li diris, ke li retrovis sian libron*.

Rim. II. ATENTU! Neniam oni ŝanĝu la futuron de la rekta parolo en kondicionalon, eĉ se la ĉefpredikato staras en preterito. La frazo: *li diris: mi venos morgaŭ* – restas en nereкта parolo: *li diris, ke li venos morgaŭ*. Kondicionalon oni uzas nur, se ĝi staras ankaŭ en la rektparola formo: *li diris, ke, se tio estus vera, tio estus jam vaste konata* (rekte: *li diris: se tio estus vera, tio estus jam vaste konata*).

Por montri pli klare la mekanismon de la ŝanĝo de rekta parolo en nerektan, ni donas ĉi-sube, en du kolonoj, la saman tekston laŭ ambaŭ formoj:

Rekta parolo:

La lernantoj lamentis al la instruisto:
 ”Ni ne meritis la punon, ĉar ni lernadis nian lecionon. Demandu niajn gepatrojn, tiuj diros al vi, kiel multe ni klopodis, sed ni ne povis ĝin kompreni. Rememoru, ke vi devis subite foriri en via lasta instruhoro kaj vi ĝin ne klarigis al ni. Se vi nun ĝin klarigus, certe tuj ni komprenus. Ni vin petas, faru tion; ni estos tre dankaj al vi. Nun ni vidas, kiel multe vi helpas nin per via klarigado”.

Nereкта parolo:

La lernantoj lamentis al la instruisto,
 ke ili ne meritis la punon, ĉar ili lernadis sian lecionon; li demandu iliajn gepatrojn, tiuj diros al li, kiel multe ili klopodis, sed ili ne povis ĝin kompreni; li rememoru, ke li devis subite foriri en sia lasta instruhoro kaj li ĝin ne klarigis al ili; se li nun ĝin klarigus certe tuj ili komprenus; ili petas lin, ke li faru tion; ili estos tre dankaj al li; nun ili vidas, kiel multe li helpas ilin per sia klarigado.

Oni klare vidas el la supra ekzemplo, ke la nereкта parolo ŝanĝas la pronomojn, sed *neniam la modojn*.

Ekzistas en E-o, kiel en multaj aliaj lingvoj, ankaŭ nereкта parolo “*libera*”, t.e. enkondukita de nenia subjunkcio. Simple post frazo entenanta vorton kun valoro de sciigo-verbo, la sekvantaj frazoj elvolvas la penson de l' koncernato. Sed, dum en la angla kaj franca, ekzemple, en tia libera nereкта parolo ĉiuj tempoj devas esti preteritaj, en E-o, male, la verboj esprimantaj samtempan agon aŭ staton kun la momento de la parolo, *nepre* devas stari en prezenco. Ekzemple:

Senĉese li ripetadis plendojn al sia patrino: la laboro estas malfacila, la kamaradoj ne afablaj. Krome la instruisto malfavoras lin, kaj, malgraŭ

ke li ĉiam laboris konsciencie, li antaŭvidas, ke li ne sukcesos sian ekzamenon. – Neeble – ekkriis la patrino...

Ĝuste dank'al tiu abrupta ŝanĝo de tempo, oni povas rekoni, kie komenciĝas nereкта parolo en tiaspeca teksto. Oni do zorge esploru la originalan tekston laŭ tiu vidpunkto kaj ne traduku mekanike la verbo-tempojn (Vidu ekzemple en "Fabeloj de Andersen" III, p.91).

SUBPROPOZICIOJ DE NEREKTA OBJEKTO

235

La nerekt-objektaj subprop-oj havas la funkcion de ĉefprop-a nereкта objekto. Ili do estas propre subprop-oj adjektaj (koncernadjektaj). Tamen ili tiom similas al la objektaj subprop-oj, ke ni pritraktas ilin inter la kompletivoj.

Ili respondas la demandojn: **de kio (kiu), pri kio (kiu), je kio (kiu), al kio (kiu)**, plus subjekto plus predikato: *mi ĝojas* (pri tio), *ke vi venis* (pri kio mi ĝojas? ke vi...). Krome tie ĉi oni povas pritrakti ankaŭ la subprop-ojn respondantajn al la demando **kun kio (kiu)**, kiam per **kun** oni esprimas ne kunecon, sed nerektan objekton (*kompari kun, renkontiĝi kun*).

Demonstrativoj povas esti **tio (tiu)** kun la respektivaj prepozicioj (de, pri, je, al, kun).

Oni povas distingi eksplikajn, rilatajn kaj demandajn (dependajn demandojn).

I. Eksplikaj nerekt-objektaj subpropozicioj. Subjunkcio: **ke**: *li dankas sian riĉon al tio, ke li estis ĉiam ege avara; mi kalkulas je tio, ke vi min helpos; neniu sciis pri tio, ke vi venos.*

La demonstrativon **pri tio** oni kutime ellasas: *mi kontentas, ke vi venis; Sokraton oni akuzis, ke li koruptas la junularon.*

Rim. I. Tiaj subprop-oj estas parencaj al la kaŭzadjektaj. Kelkfoje oni apenaŭ povas distingi: *mi ĝojas* (pri tio), *ke vi venis* kaj *mi ĝojas, ĉar vi venis*. Se la unua formo estas aplikebla, ĝi estas preferinda. Vd. § 267.

La **modo** povas esti, kiel ĉe la objektaj prop-oj:

a) **i n d i k a t i v o** (vd. la suprajn ekzemplojn);

b) **v o l i t i v o**; en la samaj okazoj, kiel ĉe la objektaj subprop-oj: *mi avertis vin, ke vi ne faru tion; la E-ismo celas al tio, ke ekzistu taŭga komprenilo inter la popoloj²; ŝi ne kutimiĝis al tio, ke oni ŝin suspektu².*

c) **k o n d i c i o n a l o**; ĉe subkomprenita supozo: *mi sciigis lin, ke mi irus* (se estus necese, se mi povus).

Rim. II. Pri *gardi* kaj *atenti* vd. § 231. Post *sin deteni* ĉe Z. troveblas u-modo kun **ne**: *li ne povis sin deteni de tio, ke li ne grimacu*. La ne ŝajnas superflua: la volitivon motivas la ideo pri impulso, kiun aludas tiu verbo.

II. Rilataj nerekt-objektaj subpropozicioj. Pri ili validas la samo, kiel pri la rekt-objektaj: *donu la leteron al tiu, kiun mi sendos al vi; mi ricevis la libron de tiu, kiun vi vidis ĉe mi hieraŭ; ne kalkulu je tiu, kiu tro*

multe promesas; mi atentigas vin pri tio, kion mi hieraŭ menciis; laŭte parolu kun tiu, kiu estas duonsurda.

Demonstrativojn oni plejofte konservas. Oni povas ellasi ilin maksimume el la par-elementoj **de tio-de kio, al tio-al kio, pri tio-pri kio** ktp. do, se la demonstrativo kaj la rilatpronomo havas la saman prepozicion. Ekz-e: *donu la libron al kiu vi ĝin promesis; mi pagis al kiu oni devis...²; mi ricevis leteron de kiu mi tute ne atendis; mi vin atentigas pri kio mi vin atentigas jam multfoje.* Sed pli konsilinde estas konservi la demonstrativon: *Marta renkontiĝis kun tio, kun kio renkontiĝas milionoj da homoj².*

Oni devas konservi la demonstrativon, se la rilatpronomo ne havas prepozicion saman. Do ekz-e: *donu la libron al kiu venos por ĝin forporti (al tiu, kiu); nenion atendu de kiu tro multe promesas (de tiu, kiu) – estas rekte nekorektaj.*

III. Dependaj demandoj nerekt-objektaj. Ili troviĝas nur je la demando **pri kio**: *li ne sciigis min, ĉu li bone prosperas (pri kio? ĉu li...); li informis min, kiel statas la afero.*

La demonstrativon **pri tio** nur malofte oni konservas: *mi estas scivola pri tio, kiam li revenos.*

Rim. III. La pri-propozicioj estas tute analogaj al la objektaj. La diferenco estas nur, ke la ĉefprop-a predikato estas netransitiva, aŭ ĝi jam havas alian rektan objekton: *mi demandas, kiam vi venos* (subprop-o objekta: mi demandas la *tempon* de via veno); *mi demandas vin, kiam vi venos* (subprop-o nerekt-objekta: mi demandas vin *pri la tempo* de via veno).

La *modo*, krom *a)* **i n d i k a t i v o**, povas esti, analoge al la objektaj subprop-oj: .

b) **v o l i t i v o**: *mi precize instruis lin, kiel li konduku; mi demandis lin, ĉu mi iru.*

c) **k o n d i c i o n a l o**: *mi sciigis lin, kiam mi estus preta pri la laboro (se oni ĝin al mi konfidus).*

SUBPROPOZICIOJ PREDIKATIVAJ

La predikativa subprop-o havas la funkcion de ĉefprop-a predikativo, propre do ĝi estas la vera predikativo de la ĉefprop-o. Oni demandas pri ĝi per demanda vorto plus subjekto plus predikato: *li estas, kia li estis* (kia li estas? kia li estis).

Ili povas esti eksplikaj, rilataj kaj dependaj demandoj.

I. Eksplikaj predikativpropozicioj. Subjunkcio: **ke**. Demonstrativo (ellasebla) **tio, tia**: *lia malfeliĉo estas (tio), ke li nenion antaŭvidas; la principo de mia amiko estas, ke li neniam manpremas.*

La *modo* povas esti ankaŭ **v o l i t i v o** (predikatprop-o cela): *lia ordono estas, ke ni iru; lia decida volo estas, ke ni faru kune la aferon.*

II. Rilataj predikativpropozicioj. Subjunkcioj: rilatpronomoj: *li estas (tiu), kiu vin savis; tio estis, kio kaŭzis lian pereon; la feino ŝanĝiĝis tia, kia ŝi estis antaŭe.*

III. **Dependaj demandoj predikativaj:** *la demando estas, ĉu li vivas aŭ mortis*. La subjekto estas plejofte *demando* aŭ *problemo*.

Se temas pri tio, kion oni faru, oni devas uzi volitivon: *la demando estas, kiam ni komencu la aferon; la problemo estas, ĉu ni iru aŭ restu*. Anstataŭ volitiva subprop-o oni povas uzi infinitivan konstruon: (... *kiam komenci la aferon; ... ĉu iri aŭ resti*).

Anstataŭ *li estas, tiu estas, tio estas* oni povas uzi **jen**: *jen kiu vin savis; jen pri kio temas; jen kion li diris; jen kial li silentas*. Se ekzistas substantiva subjekto, **jen** povas stari anstataŭ *estas*: *ĉu esti aŭ ne esti, jen la demando*.

Rim. I. La predikativa subprop-o estas tre parenca al la subjekta. Nome, oni povas renversi la ĉefprop-on farante la subjekton predikato – tiam la predikativa subprop-o iĝas subjekta: *lia malfeliĉo estas, ke li nenion antaŭvidas* (subprop-o predikativa); *tio, ke li nenion antaŭvidas, estas lia malfeliĉo* (subprop-o subjekta). La diferenco inter la du konstruoj troviĝas nur en la akcento. En la unua okazo estas akcentita "lia malfeliĉo", en la dua "tio, ke li nenion antaŭvidas". Predikativa subprop-o do akcentas la subjekton de la ĉefprop-o. Tial, por akcenti la subjekton, oni povas transformi simplajn frazojn en kompleksajn kun predikativa subprop-o. "Li savis vin" – estas simpla konstato. "Li estas, kiu vin savis" estas insista akcento pri la subjekto *li*. Same akcente oni povas diri: *jen kiu vin savis*.

Rim. II. Ankaŭ la subprop-ojn de ĉefprop-oj havantaj predikativon adverbaj oni povas, laŭ alia analizo, rigardi predikativaj. Nome oni povas rigardi tiajn adverbojn anstataŭaĵoj de substantivo, do subjekto. Sed estas pli konsilinde konservi la kutiman analizon, kaj rigardi tiajn prop-ojn subjektaj. (Vd. § 232, Rim. I.).

SUBPROPOZICIOJ EPITETAJ

237

La epitetaj subprop-oj havas la funkcion de epiteto apud iu substantiva frazelemento de la ĉefprop-o. Oni povas distingi du specojn de ili. La unu estas vera epiteto esprimita en formo de tuta prop-o; ĝin oni povas nomi *epitetpropozicio rekta*. La alia rilatas ne rekte al la substantivo, sed al ĝia suplemento ligita al ĝi per prepozicio. Tiun oni povas nomi *epitetprop-o nereakta* aŭ *suplementa*.

Pri la **v e r b o t e m p o j** vd. § 269-271.

EPITETPROPOZICIO REKTA

La *epitetprop-o rekta* havas la funkcion de adjektiva epiteto. Ĝi povas esti *eksplika* kaj *rilata*. La *eksplika* povas havi ankaŭ la formon de *dependa demando*. Unue ni pritraktu la pli oftan *rilatan* epitet-propozicion.

Epitetpropozicio rilata

238

La epiteta subpropozicio rilata respondas je la demandoj *kiu* aŭ *kia* aŭ *kiom da*, aŭ *kiel -a* plus la respektiva substantivo: *la homo, kiu vin vizitis (vizitis), estas mia amiko; mi sendos al vi la libron, pri kiu mi parolis (parolas)*.

La rektan epitetprop-on rilatan oni povas transformi en veran epiteton particip-adjektivan: *la homo vin vizitinta (vizitonta) estas mia amiko; mi sendos al vi la libron de mi preparolitan.*

La subjunkcioj estas **kiu, kia** (solaj aŭ en akuzativo aŭ kun prepozicio) kaj **kies**: *la homo, kiun vi sendis, alvenis; mi vizitis la profesoron, kies libro vin tiom interesas; mi vidis en butiko kraĵonon, kian vi serĉas; li estas tia homo, kiu neniam pardonas.*

La demonstrativojn **tiu, tia** oni povas ellasi, se la subprop-o senpere sekvas la vorton, kies epiteto ĝi estas; sed oni devas ilin konservi, se oni intermetas aliajn frazelementojn: *mi volas vidi tiun leteron de via amiko, kiu ĵus alvenis* (alvenis: la letero); *mi volas vidi la leteron de via amiko, kiu ĵus alvenis* (alvenis: la amiko).

Tamen, pro la elekta subsenco de **tiu, tia** metodo ne estas uzebla, kiam la epitetita substantivo montras evidente unu solan personon aŭ objekton. En tiaj, maloftaj, okazoj, oni devas ripeti la substantivon en la subprop-o, apud la rilatadjektivo: *la sola infano de mia amiko, kiun infanon vi vidis ĉe mi antaŭ nelonge, mortis hieraŭ.* (Vd. § 81).

Kelkfoje la substantivo, kies epiteto estas la subprop-o, estas metita en la subprop-on apud la rilatadjektivo **kiu**; tiam oni devas ĝin montri en la ĉefprop-o per **tiu**: *kiu homo unufoje ŝtelis, tiu ŝtelos ankoraŭ duafoje.*

Rim. I. Pri la uzo de artikolo antaŭ substantiva frazelemento determinita per rilata epitetpropozicio vd. § 76, Rim. IV kaj V.

Rim. II. Pri la implikitaj epitetprop-oj, vd. § 230, II. 4.

Rim. III. Oni ne uzu post **inter** elipsajn rilatajn epitetprop-ojn; tiaokaze oni rilatigu ne per **kiu**, sed per persona aŭ montra pronomo: *la knaboj, inter ili mia frateto, iris al la kampo* (ne: inter kiuj mia frateto); *la knaboj tre dankas por viaj donacoj; inter tiuj precipe por la lignoĉevalo* (ne: inter kiuj precipe...).

Rim. IV. Kelkfoje, kiel ni vidis (§ 58, B. 1.), estas elipsita la substantivo post adjektivo kun superlativa senco. Tiam, se la substantivo signas aĵon, la rilatpronomo ŝanĝiĝas je **kio**: *la sola, kion mi timis, estis, ke...*² (Kp. *la sola afero, kiun mi timis, estis, ke...*). Sed ja: *la lasta, kiun mi timas, estas li.*

La modo de la rilataj epitet-subprop-oj estas ĝenerale *indikativo*. Sed oni uzas *kondicionalon*

a) se la ĉefprop-o neas la ekziston, aŭ demandas pri la ekzisto de tio, al kio rilatas la subprop-o: *ĉu ekzistas saĝa homo, kiu komprenus tion?*² *ne estis domo, en kiu ne estus mortinto?*²; *mi diris al vi nenion, kio estus malvera?*²; *ni ne estas tiaj homoj, kiuj protektus...*²; *li ne havas monon, kiun li povus malŝpari; ĉu vi havas monon, kiun vi povus pruntedoni?*; *mi havas neniun, kiu min helpus; mi neniam vidis homon, kiu ne timus de la morto; mi aŭdis de li nenion, kion mi ne konsentus; ĉu vi trovas en mia parolo ion, kio estus absurda?*; *ĉio mankas, kio necesus.*

Rim. I. La kaŭzo de tiu ĉi kondicionalo estas, ke oni ne emas firme, indikative aserti ion pri io, kio ne ekzistas, aŭ kies ekzisto estas duba. En la kompletivoj la dependeco estas tiel forta, ke la negacio transportiĝas en la subprop-on: *mi neas, ke mi diris tion*. Sed en la epitetprop-oj la dependeco estas malpli forta, oni ne

sentas plu en ĝi la ĉefprop-an negacion, do oni klopodas ĝin sentiĝi per la kondicionala modo.

Rim. II. Oni devas atenti. Kondicionalon oni povas uzi nur, se la plena ekzisto de la epitetita ideo estas neata aŭ pridemandata en la ĉefprop-o. Se tiu objekto aŭ ideo *fakte* ekzistas, kaj oni demandas nur pri la *ĉeesto*, oni uzas indikativon: *ĉu vi vidas ie la homon, kiu kutimas promeni tie ĉi?*; *ĉu vi havas ĉe vi la monon, kiun vi volas al li prunti?* Same ĉe negacio: *mi ne trovas la arbon, kiu estas signita; mi ne vidas la domon, kiu havas ruĝan tegmenton:* (Mi ne vidas domon, kiu havas ruĝan tegmenton.)

b) se oni povas subkompreni duagradan supozan subprop-on kun se: *mi vidis juvelon, kiun volonte mi aĉetus* (se mi povus).

c) se la ĉefprop-o neas la ekziston aŭ ĉeeston aŭ demandas pri la ekzisto aŭ ĉeesto de io, kies ekzisto aŭ ĉeesto ebligas la efektiviĝon de la ago esprimita en la subprop-o: *bedaŭrinde mi ne havas ĉe mi mian geografian karton, kiu tuj nin orientus; ĉu vi vidis ie la kondukiston, kiu montrus al ni la vojon?*; *vi ne aŭdis liajn argumentojn, kiuj vin certe konvinkus.* Tia kondicionalo estas uzata ankaŭ post la ĉefpredikatoj *serĉi* kaj *proponi*: *li devas serĉi fortan brakon, kiu lin povus helpi* (K); *oni eble proponos la aranĝon de festoj intergentaj, kiuj servus...*²

Rim. III. Tia kondicionalo estas klarigebla per tio, ke oni povas subkompreni duagradan se-propozicion, kiu fiktive supozas la realecon de la ĉefprop-a neado aŭ demando, aŭ la sukceson de la serĉado, akcepton de la propono; ekz-e, en la supraj frazoj: *se mi ĉehavus ĝin* (la geografian karton); *se vi ekvidus lin* (la kondukiston); *se vi aŭdis ilin* (liajn argumentojn); *se li trovas ĝin* (fortan brakon); *se oni akceptus tiujn* (festojn intergentajn). Cetere, en tiaj okazoj la subprop-o estas mem supoza; tion pruvas la fakto, ke, se oni faras el ĝi ĉefprop-on, tiu restas en kondicionalo: ... *karton; ĝi tuj nin orientus; ... la kondukiston; li montrus al ni la vojon; ... argumentojn; tiuj vin certe konvinkus; ... fortan brakon; ĝi povus lin helpi; festoj intergentaj; ili servus...*

Rim IV. En artikolo de W. Bailey en "The British Esperantist" (Okt.-Dec. 1940) estas listigitaj ĉiuj Z-aj ekzemploj pri la kondicionalo en epitetaj subprop-oj.

En ĉiuj aliaj okazoj la kondicionalo estas nekorekta. En pluraj lingvoj ĝi uziĝas, se la epitetita vorto estas akompanata de superlativa adjektivo aŭ de la adjektivoj *sola, unika, unua, lasta*. En E-o tio estas absolute malĝusta: *ŝi deŝiris la solan (lastan) rozon, kiu restis en la ĝardeno; demandu la unuan homon, kiun vi renkontos; ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la domo*².

Malofte oni trovas ankaŭ u-modon en rektaj epitetprop-oj: tio estas motivata ĉiam de la senco (modo vola): *la aŭtoro, kies granda fervoro estu sincere laŭdata, amasigis en sia libro multegan materialon.*

Epitetpropozicio eksplika

240

Ĝia subjunkcio estas ke.

Oni trovas ĝin post substantivoj, kies senca enhavo estas eksplikebla per prop-o. Tiaj estas:

1. substantivoj kiuj esprimas *staton* (situacio, fakto, avantaĝo, ŝanco,

kvalito, cirkonstanco ktp.);

2. substantivoj, kiuj esprimas *agon spiritan* aŭ *agmanieron* (sento, penso, ideo, opinio, kredo, espero, timo, maniero, kutimo, politiko, artifiko ktp.);

3. substantivoj, kiuj esprimas *sciigon* (sciigo, informo, letero, depeŝo, vorto, parolo);

4. substantivoj, kiuj esprimas *celadon, ordonon, efikon* por aŭ kontraŭ, do, kiuj en verba formo postulas post si subprop-ojn efikecajn (vd. § 231, B). Tiaj estas ekzemple: volo, deziro, admono, konsilo, peto, postulo, ordono, devigo, neceso, bezono, trudo, permeso, malpermeso, klopodo, eblo, maleblo, malhelpo ktp.

La modo en la prop-oj epitet-eksplikaj povas esti:

a) i n d i k a t i v o, kiam temas pri ekspliko de reala fakto, do post la substantivoj sub 1., 2. kaj 3.: *la stato, ke mi devas vane atendi, ne daŭros longe; tiu aranĝo havas la vantaĝon, ke oni povas facile trovi ĉion; mi ne povas kontenti je la situacio, ke miaj manoj estas kvazaŭ ligitaj; mi fidas malgraŭ la fakto, ke la aferoj nun statas malbone.*

Mi havas la senton, ke ĉio prosperos; li esprimis la opinion, ke tio ne estas konsilinda; mi ne aprobas la politikon, ke oni semas malamon.

Mi ricevis leteron, ke li baldaŭ venos; ĉu vi aŭdis la famon, ke li mortis?; li revenis kun la informo, ke nenio grava okazis; se li estus doninta al la diablo sian vorton, ke li iros en la inferon, li neniam preĝus...²

Se la ĉefprop-a kaj subprop-a subjekto estas identa, oni povas uzi infinitivan konstruon: *mi ne havas la kutimon fumi; ili aplikas la politikon inciti unu genton kontraŭ la alia; mi havas esperon ricevi monon.* Vd. ankoraŭ § 141.

b) volitivo. Ĝin oni trovas sammaniere kiel ĉe la objektaj kaj subjektaj prop-oj:

1. post substantivoj esprimantaj sciigon, kiam la sciigo havas la karakteron de ordono aŭ peto: *mi ricevis depeŝon, ke mi iru tuj.* Tiuj estas la subprop-oj *volaj*.

Rim. I. La u-modon oni povas anstataŭigi ankaŭ per *devas*: *mi ricevis depeŝon, ke mi devas iri.*

2. post substantivoj sub 4. (vd. supre). Tiuj estas subprop-oj *efikecaj* (vd. § 231, B): *mi ricevis la ordonon, ke mi atendu; vian peton, ke mi vin helpu, mi ne povas plenumi; via klopodo, ke la afero prosperu, estis vana; la konsilo, ke vi vin gardu, estas saĝa.*

Rim. II. Post la vortoj *volo, peto, postulo, instigo, klopodo, rajto* sekvas ĉiam u-modo: *mi turnas min al vi kun la peto, ke vi diru al mi, kia estas via opinio²; la rajton, ke mi povu eldoni ankaŭ mem, mi ne rezervas al mi².* Post la vortoj *deziro* kaj *propono* sekvas u-modo, se la deziranto aŭ proponanto atendas agon de iu alia: *via deziro, ke mi donu al vi la libron, ne estas plenumbla; tiun proponon, ke mi sendu tiucelan cirkuleron, mi akceptas².* Us-modon oni uzu, se la deziranto deziras, aŭ la proponanto proponas agi mem: *via deziro, ke vi irus tien, estas stranga; via propono, ke vi mem subskribus la alvokon, ne ŝajnas sagaca².* Sed last-

okaze oni uzas prefere infinitivan konstruon: *via deziro iri... via propono subskribi mem...*

Rim. III. Post *admono*, *konsilo*, *ordono*, *neceso*, *bezono*, oni povas uzi *devas* anstataŭ u-modo: *mian admonon, ke vi devas...*; *la konsilo, ke vi devas...*; *la neceso, ke vi interkonsentu* (*devas interkonsenti*), *estas evidenta*.

Rim. IV. Post *eblo* kaj *permeso* sekvas prefere *povas*: *la eblo, ke oni lin povas savi, ĉesis*; *la permeson, ke ni povas eniri senpage la prezentadon, donis al ni la direktoro de la teatro*; *la neeblo, ke ni ne povas lin helpi, estas bedaŭrinda fakto*. Post *malpermeso* sekvas u-modo kun *ne* aŭ prefere *ne povas*: *la malpermeso, ke oni ne povas (neniu povas) eniri (ke oni ne eniru) la ĝardenon, fine estas nuligita*; *la malpermeson, ke vi ne iru tien, vi ne atentis*.

Rim. V. Kiel oni vidas, post substantivoj, kiuj havas en si negacion, oni devas uzi subprop-o-n negacian en epitetprop-o. (Komparu: *oni malpermesis, ke iu eniru la ĝardenon*).

Rim. VI. Post *timo* oni trovas ĉe Z. la samajn du konstruojn kiel post *timi* (§ 231, Rim. I.): *transdoni al iu la aferon sen timo, ke li lasos ĝin fali²*; *ŝi mallevis la okulojn pro timo, ke ŝi denove ne ridu²*. La unua konstruo (*ke ŝi denove ridos*) estas preferinda.

Oni povas uzi ankaŭ infinitivan konstruon: *mi ricevis la ordonon iri tuj*; *mi havas fine la eblon forveturi*. Tio estas eĉ preferinda.

c) **k o n d i c i o n a l o** estas la modo de l' subprop-o, kiam oni subkomprenas supozon kun *se*: *mi havas la plenan certecon, ke li ne rifuzus vin* (*se vi lin petus*); *mi ricevis la informon, ke li subtenus la aferon* (*se oni lin petus*).

Epitetaj dependaj demandoj

241

Ĉe ili ni trovas la samajn modojn, kiel ĉe la eksplikaj prop-oj:

a) **i n d i k a t i v o**: *la demando, ĉu E-o povas havi poezion, ne estas plu diskutebla*; *la dubo, ĉu li ankoraŭ vivas, fine ĉesis*; *la sciigo, kie li estas kaj kiam li revenos, ankoraŭ ne alvenis*.

b) **v o l i t i v o**: *li ne obeis la konsilojn, kiel li konduitu*; *mi ne ricevis ordonon, kiam mi revenu*; *mi ne konas la decidon, ĉu mi iru tuj aŭ mi povas iri morgaŭ*. Ĉe identaj subjektoj oni povas uzi infinitivan konstruon: *la manieron, kiel konduiti en bona societo, li neniam ellernos* (kiel li konduitu); *la ordonon, kiel iri kaj kion fari, mi komprenis*.

c) **k o n d i c i o n a l o**: *mi ne ricevis de li respondon, kiam li komen-cus la laboron* (*se ni interkonsentus, ke li ĝin faru*).

EPITETPROPOZICIO NEREKTA

242

La nereкта epitetprop-o rilatas, same kiel la rekta, al iu substantivo de l' ĉefprop-o. Tamen, ĝi rilatas al ĝi ne senpere, sed pere de prepozicio. Ĝi havas do la funkcion de suplemento apud iu ĉefprop-a substantivo. Oni do povas ĝin nomi ankaŭ *subprepozicio suplementa*. Subjunkcioj: *rilatpronomoj*. Oni demandas pri la prop-o per la substantivo plus *kio* aŭ *kiu* kun antaŭmetita prepozicio: *ne faru la aferon sen konsidero de*

tio, kion mi diris (sen konsidero de kio?); *vi ne foriros sen respondo pri tio, kion mi demandis; min mirigas via plena silento pri tio, pri kio mi vin petis.*

De tiu povas preni en la ĉefprop-o la formon ties: *kiu tro multe promesas, ties parolon ne kredu.* Vd. § 53, B. Rim. II.

Ekzistas ankaŭ e k s p l i k a nereкта epitet-propozicio (subjunkcio ke). Tiaokaze oni konservas la demonstrativojn (pri tio, ktp.): *mi ne komprenas vian indignon pri tio, ke oni diris al vi la malagrablan veron.* Post *kaŭzo* oni povas ellasi la demonstrativon (de tio): *kio do estas la kaŭzo* (de tio), *ke subite naskiĝis tia granda vento?*^z Same post *merito*: *mi perdis eĉ tiun solan meriton, ke mi propravole mortis por ĝi*^z. Tie ĉi klasiĝas ankaŭ la volitiva eksplika prop-o post *estas tempo*, kie oni ellasas la por-suplementon: *estas jam tempo, ke ni ekiru* (tempo por tio, ke...).

SUBPROPOZICIOJ ADJEKTAJ

Divido

243

La adjektaj subprop-oj havas la funkcion de ĉefprop-a adjekto. Propre do, ili estas adjektoj de l' ĉefprop-a predikato, sed en formo de tuta propozicio. El tio sekvas, ke ekzistas tiom da specoj de adjektaj subprop-oj, kiom da specoj de adjektoj. Do estas distingeblaj:

1. Subprop-oj *koncernadjektaj*, kiuj montras, kiun aŭ kion koncernas la ĉefprop-a ago. Ilin, kiel *subprop-ojn de nereкта objekto*, ni jam pri-traktis ĉe la subprop-oj kompletivaj (vd. § 235).
2. Subprop-oj *lokaj*, kiuj montras la lokon de la ĉefprop-a ago per la loko de sia ago.
3. Subprop-oj *tempaj*, kiuj difinas la tempon de la ĉefprop-a ago per la tempo de sia ago.
4. Subprop-oj *stataj*, kiuj montras:
 - a) la rilaton de la ĉefprop-a aganto aŭ agato, pere de la predikato, al alia ago, stato aŭ aganto (*kun, sen, anstataŭ, krom*; origina rilato, rezulta rilato).
 - b) la kondiĉon, ĉe kiu aŭ malgraŭ kiu la ĉefprop-a ago okazas aŭ okazus (supozaj kaj koncedaj subprop-oj).
5. Subprop-oj *modalaj*, kiuj montras la modalecon de l' ĉefprop-a ago (manieron, kaŭzon aŭ celon).

SUBPROPOZICIOJ LOKAJ

244

Ili havas la funkcion de ĉefprop-a lokadjekto. Respondas je la demandoj: *kie, kien, de kie, ĝis kie*. La samajn rilativojn ili havas kiel subjunkciojn. Demonstrativoj: *tie, tien, de tie, ĝis tie*.

La demonstrativojn oni povas ellasi, se ilia formo estas la sama kiel tiu de la rilativo: *li iras* (tien), *kien mi intencis iri*; *li promenis* (tie), *kie oni laboris sur la kampoj*; *li venis* (de tie), *de kie la hirundoj alflugas prin-*

tempe; li iris (ĝis tie), ĝis kie neniu povis iri antaŭe. Sed: ni jam revenis de tie, kien vi iras; kuru ĝis tie, kie tiu standardo estas fiksita; tie ni sidigu, kie estas ombro; tien iru, kien mi ordonis (emfaza tien).

Rim. Loka subpropozicio povas rilati ankaŭ al ĉefprop-a lokadjekto: *ni sidigis apud la fonto, kie estas agrabla ombro.* Tiaokaze la lokpropozicio anstataŭas subprop-on epitetan (*apud la fonto, apud kiu estas...*). Kelkfoje oni trovas ankaŭ tiaokaze elipsita la vorton "loko", kaj tiam uziĝas infinitiva konstruo: *ne troviĝas, kie sidi; ne restis jam, kie ricevi (la invititojn)*².

Pri la *verbotempoj* vd. § 270.

SUBPROPOZICIOJ TEMPJAJ

245

La subpropozicioj tempaj havas la funkcion de ĉefprop-a tempadjekto: ili difinas la tempon de la ĉefprop-a ago per la tempo de la subprop-a ago. Ili respondas la demandojn: **kiam, de kiam, ĝis kiam kaj kiel longe** (dum kia daŭro). Ni pritraktos ilin laŭ la demandoj, kiujn ili respondas.

I. KIAM?

La tempa subprop-o respondanta je la demando **kiam**, povas esprimi agon samtempan, antaŭtempan aŭ posttempan rilate al la ĉefprop-a ago. Ĝi respondas al la aktualaj tempadjektoj (§ 193).

Samtempeco

246

La samtempa subprop-o tempa povas esprimi

A. En kiu tempopunkto okazas la ĉefprop-a ago. Tiaokaze ekzistas du eblajoj:

a) La ago estas **unufoja**. La subjunkcio estas **kiam**, la demonstrativo (tiam) plejofte mankas: *kiam la domo ekbrulis, ĉiuj loĝantoj dormis; tagiĝis, kiam ili hejmenvenis el la amuzejo.*

b) La ago estas **plurfoja**. Subjunkcioj: **kiomfoje** (neanoncata en la ĉefprop-o), **kiam** aŭ **se** (anoncataj per **ĉiufoje** aŭ **ĉiam**): *ĉu vi min ĉiam helpos, se mi vin petos?; kiomfoje li ŝin rememoris, liaj okuloj pleniĝis de larmoj; ĉiufoje, se li venas, li alportas donacon; ŝi ĉiam nur ridis, se li parolis al ŝi pri amo; mi trovis lin ĉiam ĉe laboro, kiam mi lin vizitis.*

Rim. I. La uzon de **se** povas pravigi, ke en tiaj okazoj ja temas pri pluraj okazoj kaj la senco de **se** ja estas ankaŭ *en la okazo ke*.

B. En kiu tempodaŭro okazas la ĉefprop-a ago. La subjunkcioj estas:

a) **dum**, se ambaŭ agoj estas pli-malpli daŭraj: *dum vi skribos la leteron, mi legos ion; dum la kantistino kantis, ĉiuj silentis atentante; dum li ne estis hejme, oni prirabis lian loĝejon; dum vi estos feliĉa, vi havos multajn amikojn.*

b) **kiam**, se la ĉefprop-a ago estas momenta: *kiam li iris sur la kampo, subite bruo ekfrapis liajn orelojn; kiam li foje vagadis en la arbaro, lin pikis venena serpento; kiam mi skribis la leteron, li envenis.* En tiaj okazoj, por esti tute preciza, oni devus uzi kompleksan verbon imper-

fektan: *kiam mi estis skribanta la leteron, li envenis*. Aŭ sufiksoidon ad: *kiam mi skribadis la leteron...* Sed tio estas plejofte tute nenecesa, oni ĝin *devas* uzi nur, se la simpla ago signifas *momentan* agon: *kiam li estis mortanta (mortadis), la kuracisto envenis*.

Rim. II. Se la subprop-o esprimas staton, oni povas uzi *dum* nur, se la stato estas aŭ povas esti limita: *dum Miltono estis en Romo, li verkis gajajn poemojn*. Sed se la stato iĝis definitiva stato de l' aganto, oni *devas* uzi *kiam... jam*: *kiam Miltono estis jam blinda, li diktis siajn poemojn*.

Rim. III. Anstataŭ la simpla *dum*, ĉar ĝi estas ankaŭ prepozicio, oni proponis la formon *dum kiam*. Sed ĝi estas parte superflua, ĉar la duobla funkcio de *dum* neniam estigas konfuzon; parte tute neebila kaj stranga pro sia hibrideco. *Dum* ja signifas longan daŭron kaj *kiam* tempopunkton, do la signifo de *dum kiam* estas: dum longa daŭro de tempopunkto: evidenta kontraŭsenco*. Pro tio oni uzas ankaŭ demande anstataŭ ĝi la formon kiel longe aŭ eĉ *dum kiom da tempo*.

Pri *kiam* anstataŭ per tio ke vd. § 264, Rim.

Antaŭtempeco

La subjunkcio de la antaŭtempa tempo-prop-o estas post *kiam* aŭ **post ol**.

247

Rim. I. Tiu lasta formo estas multe pli oportuna, kaj cetere konforma al la responda *antaŭ ol*; Zamenhof, konsultita de Boirac pri tiu formo, ĝin "plene aprobis" (*Oficiala Gazeto*, 1914, p. 156). Ke ĝi estas ĝis nun apenaŭ uzata, kaŭzis verŝajne la influo de la latina *postquam* kaj de la analoga rusa formo.

Ekzemploj: *post kiam ŝi estis mallongan tempon en la arbaro, fariĝis nokto*²; *ekbatis la koro de David, post kiam li kalkuligis la popolon*²; *post ol la prezidanto malfermis la kunsidon, oni komencis la tagordon; baldaŭ post kiam li abdikis, oni lin reelektis; nelonge post kiam ŝi mortis, li starigis sur ŝia tombo belan monumenton*.

Se oni ne volas akcenti la antaŭtempecon, oni povas uzi ankaŭ la simplan subjunkcion *kiam*. Tiaokaze la antaŭtempecon oni signas

a) Per kompleksa formo kun preterita participo: *kiam mi estis skribinta la leteron, mi ĝin sigelis; kiam mi estos fininta mian laboron, ni povos ludi* (tempoj perfektaj).

b) Per *jam*, se la subprop-a predikato esprimas momentan agon preteritan: *la kuracisto venis, kiam la malsanulo jam mortis; mi retrovis mian fontplumon, kiam mi aĉetis jam novan; li venis, kiam ni ekiris jam*. Kp. § 271, Rim. III.

Rim. II. Se la subjekto estas persona pronomo, estas konsilinde meti *jam* post la verbo, por eviti malagrablan rimadon (*kiam li jam*).

Sufiĉas simpla *kiam*:

* Krome, estus strange uzi *nur* prepozicie la latindevenan *dum*, kiu estas *nur* subjunkcio en la latina.

c) Se la subprop-a predikato havas la prefiksoidojn el, for, al*: *kiam oni elkondukis la atestantojn, la monarĥo sin fetis sur la plankon* (Kabe); *kiam oni forportis la pakaĵojn, la vicreĝo invitis la du senditojn* (Kabe); *kiam oni alportis la bieron, li verŝis al si²; kiam mi ellegis la libron, mi ĝin vendis*. Samtempecon tiaokaze oni esprimas per **dum:dum** li alportis la bieron, li trinkis el ĝi la duonon; *dum la gastoj foriris, li staris en la pordo*.

d) Se la antaŭtempeco evidente sekvas el la senco: *kiam en la pordo aperis la figuro de bela junulo, la tri viroj iris al li renkonte²; kiam li ŝin demandis, ŝi respondis jene...*

e) Se la predikato estas fini: *kiam mi finis la laboron, mi iris vespermanĝi*.

Rim. III. Se la subprop-a predikato estas verbo de daŭro, jam ne taŭgas ĉi-sence, ĉar ĝi povas signi, ke la daŭra ago jam komenciĝis: *li venis, kiam mi skribis jam la leteron* (jam komencis la skribon). Sed ĉar ankaŭ tia senco ne estas nepra, oni diru lastsence: *kiam mi ekskribis jam* (vd. jam § 90).

Rim. IV. Laŭ la ekzemploj de Zamenhof kaj Kabe kaj aliaj bonaj aŭtoroj, la kompleksaj verboformoj estas laŭeble evitindaj. Se oni ne povas signi la antaŭtempecon per jam, kaj oni ne havas la kazojn c), d), e), oni uzu prefere **post kiam, post ol**. Kompleksan verboformon nur, por esprimi daŭran agon finitan en la estonteco (perfekta futuro): *kiam li estos skribinta la leteron, mi revenos*. Nome la simpla futuro kun **post kiam** (*post kiam li skribos*) signifas nur, ke li skribos, sed ne, ke li ankaŭ finos la leteron. Kp. § 271, Rim. III.

Rim. V. Se la predikato estas pasiva, ĝi per si mem esprimas la antaŭtempecon, do **post kiam** aŭ **post ol** estas superflua: *kiam la mono estos kolektita, ni ĝin deponos en banko*.

Rim. VI. Ĉe predikato futura, la subjunkcio povas esti ankaŭ **se**, ĉar rilate al futuro estas nur nuanceta diferenco inter fakto kaj supozo: *se vi interkonatiĝos, vi certe estos bonaj amikoj*.

Se la antaŭtempeco estas nur momenta, aŭ mallonga, oni ĝin signas per **tuj kiam, baldaŭ kiam**: *tuj kiam li ekaŭdis la vekrion, li alkuris; baldaŭ kiam li venis en la ĉambiron, oni lin prezentis al la mastrino*. Tuj kaj baldaŭ apartenas propre al la ĉefprop-o, do la tempa subprop-o estas intermetita.

La jusan antaŭtempecon oni povas esprimi ankaŭ per **apenaŭ**: *apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi ekvidis sinjorinon²*. Tiaokaze **apenaŭ** funkcias kiel subjunkcio (kp. § 89, Rim.; § 248, Rim. III.).

Posttempeco

248

La subjunkcio de la posttempa tempo-prop-o estas **antaŭ ol**.

Rim. I. Oni trovas kelkfoje ankaŭ **antaŭ kiam**, analoge al **post kiam**. Sed tio estas

* Propre ĉe ĉiuj prefiksoidoj, kiuj funkcias kiel predikataj adjektoj laŭ sia senco (vd. § 365, Rim. II.).

pli peza, do neniel rekomendinda. Prefere oni povas uzi **post ol** anstataŭ **post kiam**.

Ekzemploj: *antaŭ ol ilia domo forbrulis, ili estis sufiĉe bonhavaj; nia ŝipo, unu horon antaŭ ol la tempesto ekfuriozis, jam estis en sekura rodo; vere, vere mi diras al vi, antaŭ ol la koko krios hodiaŭ, vi mal-konfesos min trifoje.*

Post **antaŭ ol** oni povas uzi ankaŭ infinitivan konstruon, se la subjekto estas identa: *antaŭ ol foriri, ni vespermanĝos.*

Rim. II. **Antaŭ ol** povas esti uzata por distingi inter la loka kaj tempa **antaŭ** en okazo de neceso: *li venis antaŭ ol mi.* Tio estas elipsa propozicio: *li venis antaŭ ol mi venis.* Same oni povas diri: *li venis post ol mi* – por nepriĝi, ke ne temas pri: *li venis malantaŭ mi.* Kp. § 271, Rim. III.

Oni povas esprimi la posttempecon ankaŭ per **jam** en la ĉefprop-o: *kiam la kuracisto alvenis, la malsanulo jam mortis.* Sed tio estas tute klara nur ĉe verboj de momenta ago (Vd. § 247, b.).

Se la posttempeco estas nur momenta aŭ mallonga, oni uzas **ĵus kiam**: *ĵus kiam la tegmento defalis, li elkuris el la brulanta domo. Ĵus apartenas al la ĉefprop-o, do la tempa subprop-o estas intermetita.*

Rim. III. La tujan posttempecon de la subprop-o povas esprimi ankaŭ **apenaŭ** en la ĉefprop-o: *apenaŭ mi ellitiĝis, kiam li venis.* Tiaokaze **apenaŭ** funkcias kiel adverbo (kp. § 247, ĉe-fine).

En la posttempa prop-o oni uzas indikativon, se la ago fakte okazis: *antaŭ ol ni iris al la teatro, ni vespermanĝis.* Same, se temas pri futura ago verŝajne okazonta: *antaŭ ol ni iros al la teatro, ni vespermanĝos.* Kondicionalon oni uzas, se la ago ne okazis, ĉar ĝin malhelpis la ĉefprop-a ago: *antaŭ ol Aleksandro estus realiginta siajn grandiozajn planojn, li subite mortis.*

Rim. IV. Se oni volas esprimi, ke la subprop-a ago malhelpis ĵus antaŭe okazontan agon, oni metas **preskaŭ** en la ĉefprop-o: *preskaŭ ŝi falis, kiam mi ŝin kaptis* (indikativo, ĉar tio, ke la ago preskaŭ okazis, estas fakto).

Rim. V. Oni ne uzas negacion en la subprop-o, kiam ĝi enestas en la ĉefa. Jen malbona ekzemplo de Kabe: *mi ne moviĝos de ĉi tie, antaŭ kiam mi ne kolektos 20 talentojn (= antaŭ ol mi kolektos)* – kaj bona de Z.: *mi ne sidiĝos al la tablo, antaŭ ol li venos ĉi tien.* Vd. ankoraŭ § 271, Rim. III.



Participaj konstruoj. Ĉiun tempo-propozicion oni povas transformi en partecipan konstruon, se la ĉefprop-a kaj subprop-a subjekto estas identa. La participo alprenas adverban formon. Prezenca participo signas samtempecon, preterita antaŭtempecon, futura posttempecon rilate al la ĉefprop-a ago: *skribante la leteron, mi estis tre ĉagrenata de la malbona plumo; skribinte la leteron, mi ĝin sigelis; skribonte la leteron, mi longe meditis kiel komenci.*

Se la subjektoj ne estas identaj, oni ne povas uzi particip-adverbon, do en E-o ne ekzistas *participo absoluta*. Vd. § 183, II.

250 Ke. Oni ne uzas ke en tempo-propozicioj. Tamen tio, eĉ se nekutima, teorie estas ebla:

1. se oni uzas la demonstrativojn **dum tio, post tio, antaŭ tio** en la ĉefprop-o, por insisti pri la tempo. Nome, la enhavo de **tio** ĉiam estas eksplikebla per ke-propozicio, almenaŭ teorie: *multo okazis post tio, ke vi foriris; sciigu min pri via decido antaŭ tio, ke vi ion faros.*

2. se oni volas esprimi ne nur tempan, sed ankaŭ kaŭzan interrilaton (tempa-kaŭza ke): *post (tio) ke Aleksandro murdis Kliton, sian intimulon, apenaŭ li sin detenis de sinmortigo; tiam ke ili estis en Romo, kompreneble ili rigardis la katakombojn; nun ke mi finis mian taskon, mi ripozas; nun ke vi certe faros, kion vi promesis, mi estas tute trankvila.* Kiel oni vidas, ke en tiaj okazoj anstataŭus ĉar.

Sed oni ne uzu ke senkaŭze, t.e. sen insista kaŭza interrilato. Oni memoru, ke tiuj formoj ĝis nun estas *neuzataj kaj tute ne zamenhofaj*. Sed cetere, tiu kaŭza ke estas same pravigebla, kiel la kompara ol en antaŭ ol.

251 Epiteta tempo-propozicio. Tempa subprop-o povas rilati ankaŭ al ĉefprop-a temp-adjekto: *li venis ĝuste en tiu tempo, kiam mi ne estis hejme.* Tiaokaze la subprop-o anstataŭas epitetan rilatan subprop-on: *en tiu tempo, en kiu...*

Tiaokaze oni neniam uzu ke! Ekz-e: *la lastan okazon, kiam mi lin vidis, mi lin eĉ ne rekonis.*

Tie ĉi povas klasiĝi ankaŭ la epitetaj subprop-oj rilatantaj al la verbo esti: *estas la horo, kiam la infanoj iras dormi; nun venis la tempo, kiam devis komenciĝi la vespermanĝo^Z.* Ankaŭ ĉi tie, ke estus krude mal-korekta: oni ne lasu sin trompi per la ekstera simileco kun la frazturno *estas tempo, ke* (Vd. § 242)!

Rim. En la antaŭa eldono, ni same rekomendis la uzon de **kiam** post la indiko de grado en tempa serio: *estis la unua fojo, kiam ministro paroladis Esperante.* Post pli vasta diskutado de tiu punkto kaj konsiderado de zamenhofaj ekzemploj, ni nun opinias, ke en tiaj okazoj la nuanco de tempo estas malpli grava ol tiu de serio (ĉiam akcentata de unu el la epitetoj **unua, lasta, sola** ktp.), kaj sekve la uzo de **ke** estas preferinda: *tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino^Z; ĝi estis la lasta nokto, ke ŝi enspiradis tiun saman aeron, kiel li^Z.* Kiel oni vidas, Z. ĉiam esprimis tiaokaze neŭtran subjekton (**tio, ĝi** ktp.); nuntempe pli kutima estas ties ellaso: *estis la unua fojo, ke ŝi renkontis lin.*

II. DE KIAM?

252 La tempo-propozicioj respondantaj je **de kiam** anstataŭas komencan tempadjekton (vd. § 194.)

La subjunkcio estas **de kiam**: *li ripozas nek tage nek nokte, de kiam li okupiĝas pri tiu ĉi problemo.* Kp. § 271, Rim.

Rim. La esprimo: **de post kiam** estas senutila vortplimultigo. Por esprimi ne nur tempan, sed ankaŭ kaŭzan interrilaton, oni povus uzi ankaŭ **de tiam ke**: *mi fartas multe pli bone de tiam, ke mi loĝas en la kamparo.* Sed ankaŭ tio estas ne-zamen-

hofa, kaj ĝis nun neuzata. En la poezio oni povus uzi eĉ *ek-ke: ek-ke li ŝin ekvidis, li ne trovis trankvilon.*

III. ĜIS KIAM?

La tempaj subprop-oj respondantaj je ĝis kiam anstataŭas finan tempadjekton. La subjunkcio estas ĝis.

Ĝis do enkondukas subprop-ojn, kiuj esprimas momentan agon kaj per ties tempopunkto difinas la finan punkton de la daŭra ago ĉefprop-a: *longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas²; mi ne trankviliĝos tiel longe, ĝis la demando estos solvita²; mi ne kredis al la diroj, ĝis mi venis².*

Oni devas atenti pri tio, ke ĝis kiel prepozicio signas la finon de daŭra ago per tempo-punkto: *mi atendis ĝis la naŭa horo.* La saman sencon ĝi havas ankaŭ kiel subjunkcio. Do, ĝi ne povas stari antaŭ verbo, kiu signas daŭran agon, ĉar tiel oni ne scios, ĉu la finanta tempo-punkto estas la komenco, mezo aŭ fino de tiu daŭra ago. Ekz-e: la frazo: *mi ĉeestis, ĝis li dormis* estas tute malklara, ĉar oni ne scias, ĉu mi ĉeestis ĝis li komencis, aŭ ĝis li finis la dormadon.

El tio sekvas, ke ĉe daŭraj verboj oni devas certigi

a) la komencon per la komenca aspekto: *longa tempo pasis, ĝis oni ekkonstruis tiun domon;*

b) la finon de la ago per la fina aspekto aŭ per perfekta verbo-tempo: *longa tempo pasis, ĝis oni elkonstruis tiun domon,* aŭ: *longa tempo pasos, ĝis tiu domo estos konstruita.* Tio estas uzebla kompreneble nur ĉe verboj de rezulto.

c) la ĉeson de la ago per *ne... plu: mi silentos, ĝis oni ne plu bruos.* Tio estas uzebla, kompreneble, nur ĉe verboj sen rezulto, aŭ ĉe verboj de rezulto tiam, kiam oni ne insistas pri la plena plenumo de la ago: *mi atendas, ĝis vi ne plu skribos.*

Sed oni ne povas uzi ĝis kun simpla negacio, ĉar la nefaro de ĉia ago, eĉ de momenta, ampleksas nepre daŭron. Kelkaj bonaj stilistoj eraris pri tiu punkto kaj uzis ĝis en la senco "tiel longe kiel" antaŭ negacio: *la eksperimentojn reformatorajn mi ĉiam tenis por danĝeraj por nia afero, ĝis ĝi ne tute ankoraŭ fortiĝis* (Z., 1889); *mi ne kredos al viaj vortoj, ĝis vi ne donos pruvojn* (Kabe). Tio devus esti korektita: *dum ĝi ne tute fortiĝis...* aŭ: *tiel longe, kiel vi ne donos...*, aŭ, sen negacio: *ĝis ĝi tute fortiĝos...* aŭ: *antaŭ ol vi donos pruvojn.* (Kp. §113, Rim. IV, a).

Male estas pri *dum*. Vd. ĉi-sube § 254.

Rim. I. Oni kelkfoje renkontas ankaŭ ĝis kiam, uzata por distingi inter la subjunkcia kaj la prepozicia ĝis. Kvankam tiu duobla funkcio neniam estigas konfuzon (kio ne estas vera pri la duoblasignifa ĝis kiam: *skribu al mi, ĝis kiam mi povos trovi vin hejme* estas demando pri informo, sed *skribu al mi, ĝis mi povos trovi vin hejme* estas peto pri korespondado en atendo de buŝa interparolo!), ĝis kiam estas pli tolerebla, ol *dum kiam*; unu ekzemplon oni eĉ trovas ĉe Z.: *viaj filoj estos paŝtistoj en la dezerto dum kvardek jaroj, ĝis kiam viaj kadavroj konsumiĝos en la dezerto.*

Rim. II. Z. uzis kelkfoje kondicionalon en ĝis-propozicio post negacia ĉefprop-o: *oni ne devas atendi, ĝis la tuta domo renversigus*. Tio ŝajnas neimitinda. Oni uzu simplan futuron, kiu havas tute la saman sencon, sen eĉ nuanca diferenco.

IV. KIEL LONGE?

254

La subjunkcio de la prop-oj respondantaj je la demando kiel longe estas dum. Ĝi enkondukas subprop-ojn, kiuj difinas la finan tempolimon de daŭra ago per ago samdaŭra: *li toleris, dum li povis*.

Dum do havas en si la signifon de daŭro, kies fino sekvigas ankaŭ la finon de la ĉefprop-a ago. Ĝin oni do povas uzi nur kun verboj de daŭro. Kaj, ĉar la nefaro de ĉia ago ampleksas nepre daŭron, oni povas ĝin uzi ankaŭ kun simpla negacio: *ni ne foriros, dum oni nin ne elfetos* (= *ĝis oni nin elfetos*). Sed oni ne povas uzi dum ne plu, ĉar ne plu signas ĉeson de ago, do ion momentan, sendaŭran.

Tiel oni povas konstati, ke dum estas la malo de ĝis (*ĝis = dum ne; dum = ĝis ne plu*).

Pli emfaze, oni povas enkonduki tiajn propoziciojn ankaŭ per: **tiel longe dum^Z; tiel longe kiel; kiel longe: tiel longe, dum la situacio tion bezonos, ni pagu duoblan kotizon; tiel longe, kiel ni tion ne havos, al ni ĉiam minacos anarĥio^Z; kiel longe vi tenos vin je via vorto, ankaŭ mi tenos min je la mia**.

Rim. Kompreneble, pri la daŭro de ago oni povas ĉiam demandi per ĝis kiam^Z, ĉar oni antaŭe ne scias, ĉu la respondanto difinos la tempon de la daŭro per tempopunkto aŭ per daŭro-fino. Tial, pro la forto de la analogio, oni ofte respondas ankaŭ en la dua okazo per ĝis kiam: *ĝis kiam vi toleros tion? Ĝis kiam mi povos*. Kvankam trudita de la analogio, tio estas nelogika kaj evitinda.

Pri la adversa dum vd. § 223.

SUBPROPOZICIOJ STATAJ

255

La subprop-oj stataj havas la funkcion de ĉefprop-a statadjekto. Do, same kiel tiujn, oni dividas ilin en adjektojn situaciajn, originajn kaj rezultajn.

Pri la *verbotempoj* en la stataj subprop-oj vd. § 271.

A. — SUBPROPOZICIOJ SITUACIAJ

La situaciaj subprop-oj dividiĝas, same kiel la situaciaj adjektoj, en *societajn, separativajn*, plue en *statindikajn, kondiĉajn kaj koncedajn*. La kondiĉajn subprop-ojn kutime oni nomas *supozaj* kaj ni pritraktos ilin sub tiu ĉi nomo.

Subpropozicioj societaj kaj separativaj

A. — El la situaciaj prop-oj mallonge oni povas fini pri la *societaj*. Ili povas esti *eksplikaj (ke)*: *mia permeso estis ligita kun tio, ke vi ĝustatempe revenos; kaj rilataj: jen li venas kun tiu, kiun ni atendas*. Pri kom-

pari kun, renkontiĝi kun (nerektobjektaj prop-oj) kaj pri la ellaso de la demonstrativo vd. § 235.

B. — La *separativaj* prop-oj indikas, ke la ĉefprop-a ago okazas *sen io, anstataŭ io, krom io, escepte de io*. Ili povas esti:

I. Eksplikaj. Subjunkcio: *ke*. Demonstrativoj: *tio* kun la respektiva prepozicio: *li foriris sen tio, ke oni tion rimarkis; anstataŭ tio, ke ni vane atendas, pli bone estos tuj komenci la laboron; nenio okazis krom tio, ke mi ricevis malgravan leteron; ĉion vi rakontis, escepte de tio, ke vi mem estis kulpa pri ĉio*.

La demonstrativon *tio* oni kutime ellasas, kroĉante la subjunkcion al la nuda prepozicio: *li iris al vi, sen ke mi lin sendis; anstataŭ ke vi portos la pakaĵon mem, pli bone estos ĝin sendi per biciklisto; li nenion vidis, krom ke granda grif' en sia nesto sidis; mi estas pri vi kontenta, escepte ke via skribo estas ankoraŭ iom senorda; ĉion mi permesis al vi, escepte ke vi faru tion ĉi* (u-modo post *permesi!*).

La *modo* povas esti indikativo, kiel ni montris en la supraj ekzemploj. Sed post *sen ke* aŭ *sen tio ke* prefere oni uzas kondicionalon: *li neniam povis ekrigardi vin sen tio, ke li batus sin en la bruston^Z; li trairis la kadukan ponton, sen ke ĝi rompiĝus*. Post *anstataŭ ke* oni uzas indikativon, se la subprop-o esprimas realaĵon: *anstataŭ ke vi babilas sence, ni devus ja lerni kune; anstataŭ ke ĉiu lernas diversajn lingvojn, ĉiuj ellernadu unu saman lingvon^Z*. Kondicionalon oni devas uzi, se la subprop-o esprimas nerealaĵon: *li babilis sence, anstataŭ ke ni lernus (estus lernintaj) kune*.

Post *anstataŭ kaj krom*, se la subprop-a kaj ĉefprop-a subjekto estas identa, oni uzas *infinitivan* konstruon: *kiel vi ne laboras anstataŭ promeni?; li nenion faras krom manĝi*.

Anstataŭ *sen ke*, se la subjektoj identas, oni uzas *participadverbon* kun *ne* (*ne* -ante, *ne* -inte). Prezenca participo signas samtempecon, preteritan antaŭtempecon rilate al la ĉefprop-a ago: *li foriris ne manĝinte* (sen ke li antaŭe manĝis); *li foriris ne rerigardante* (sen ke li rerigardis dum foriro).

Infinitivan konstruon post *sen* Zamenhof malkonsilis. Sed ankaŭ li mem uzis tian kelkfoje: *li tion ne povas sen elmeti sin al danĝero; la suno neniam levigas sen rigardi batalojn*. Tia konstruo, eĉ se ĝi ne estas nepre klasika, certe estas tute logika kaj uzata en multaj lingvoj, do neniel malprobekbla. Efektive, ĝi pli kaj pli enradikiĝas. Plej nekutima ĝi estas, se post *sen* sekvas sola infinitivo; tiam oni uzu prefere verbo-substantivon: *li foriris sen manĝo, sen saluto, sen ia diro*. Sed: *li foriris sen premiaman manon* — ŝajnas same bona, kiel: *ne preminte mian manon*. Kaj precipe utila ĝi estas, se la frazo jam entenas negacion, kiel en la supraj *Z*-aj ekzemploj.

Post *anstataŭ* oni povas uzi elipsan propozicion, se la subjekto kaj predikato estas identaj en la ĉefprop-o kaj subprop-o. Tio estas, oni sub-

komprenas la infinitivon: *Petro batis Paŭlon anstataŭ (bati) Vilhelmon; mi parolis kun Maria anstataŭ (paroli) kun ŝia fratino*. Tio servas por distingi inter la subjunkcia kaj prepozicia funkcio de *anstataŭ*: *anstataŭ Vilhelmo, anstataŭ ŝia fratino* povus signifi, ke *Vilhelmo* devus bati aŭ la *fratino* devus paroli kun Maria.

Ankaŭ post **krom** oni povas apliki la saman konstruon, sed ĝi apenaŭ estas uzata: *nenion mi skribis krom (skribi) mallongan leteron*.

II. *Rilataj*. Subjunkcioj: rilatpronomoj. Demonstrativoj: **tio** kaj **tiu** kun la respektivaj prepozicioj: *li ne prosperos sen tio, kion mi al li konsilis; mi venis anstataŭ tiu, kun kiu vi interkonsentis; neniu venis krom tiu, kiun neniu atendis; ĉio prosperis krom tio, por kio pleje ni klopodis; multo okazis ankoraŭ krom tio, kion mi rakontis; ĉion mi permesis al vi escepte de tio, kion vi faris; Paŭla nenion amas krom kion Paŭlo* (krom ami kion Paŭlo amas).

Demonstrativoj ne estas ellaseblaj; krom, eventuale, se ili havas prepozicion saman kun la rilativo: *li ne prosperos sen kio neniu prosperis ĝis nun: li devos saĝe kalkuli*.

Pri la *separativa supozo* vd. § 257, II.

Subpropozicioj statindikaj

256

La statindikaj subprop-oj esprimas la realan staton de la subjekto aŭ de la objekto. La plej simplaj el ili estas tiuj, en kiuj la subprop-on anoncas ĉefprop-a demonstrativo kun statindika prepozicio: *mi surprizis lin ĉe tio, ke li volis ŝteli mian monujon*.

Sed la staton de la subjekto aŭ de la objekto povas montri ankaŭ predikativo (vd. § 236). Do la statindika subprop-o povas aperi sub la formo de predikativa subpropozicio: *mi resendis la varon tia, kia mi ĝin ricevis*.

Realan staton povas esprimi ankaŭ kiel, perdante ĉi-okaze sian komparan sencon: *ni manĝis la viandon kiel kotleton*. Sed la substantivo post tia kiel ne estas kompletigebla je stata subpropozicio: ĝi estas statadjekto, kiu anstataŭ prepozicio havas antaŭ si la "ligantan vorton" kiel. Pro tio ĉi, tiujn kiel-esprimojn ni pritraktis inter la stat-indikaj adjektoj (§ 200).

257

Subpropozicioj supozaj

La supozaj subprop-oj indikas ion, kio estas necesa kondiĉo por la efektiviĝo de la ĉefprop-a enhavo. Ilia speciala subjunkcio estas *se*.

I. Ĉe ili oni povas distingi kvar kazojn:

1. *Kazo reala*. La frazo indikas, ke la ĉefprop-a enhavo estas sekvo de fakta ago aŭ stato. La modo estas indikativo. Tie ĉi do oni povas paroli pri subprop-oj de *reala kondiĉo*. Ilin oni ne povas enkonduki per la supozaj *se*, ĉar supozo ja ekskludas realecon. Aparta kondiĉa subjunkcio

ne ekzistas*. La kazon realan la lingvo esprimas:

a) aŭ per *ĉar* (do per kaŭzadjekta subprop-o): *ĉar vi bone faris vian taskon, mi vin rekompencos.*

b) aŭ per *kiam* (do per tempa subprop-o, signante nur la tempan interdependon kaj divenigante la kondiĉan interrilaton el la kunteksto): *kiam vi mensogis, oni rajte vin punis.*

c) aŭ per la identiga kiel (vd. § 200, c.) aŭ per *estante* (vd. samloke).

Tamen, kelkfoje se estas uzata ankaŭ en subprop-oj esprimantaj realajn kondiĉojn:

aa) ĝi povas anstataŭi *ĉar* (*motivanta se*) aŭ *dum* (*demand-motivanta se*) (vd. § 267, Rim. VI.). Pri la tempa se vd. § 247, Rim. VI.

bb) ĝi povas anstataŭi *ke* en antaŭmetitaj eksplikaj subprop-oj: *se Esperanto tamen vivis kaj kreskis regule, ni povas pri tio sincere nin gratuli²; se Volapük akiris certan nombron da adeptoj, tio okazis nur tial, ke...².*

Rimarku, ke postmetinte la subprop-on, oni uzus nepre *ke* ĉi-okaze. Tiaj *realaj se-prop-oj*, cetere, estas uzeblaj nur, kiam la ĉefprop-o resumas per tio la enhavon de la subprop-o.

2. *Kazo teoria.* La frazo indikas ne la kondiĉon de ia aparta, speciala ago aŭ stato, sed montras kvazaŭ abstrakte, teorie la kondiĉan interdependon de du agoj aŭ statoj. La *modo* estas indikativo; la tempo estas plejofte prezenca, ĉar tian teorian interdependon oni sentas sendependa de tempo (*prezenco eterna*). Se la tempoj malsamas, tio montras nur la tempan interrilaton inter la du prop-oj, sed mankas ia rilato al la efektiva nuntempo: *se oni faras sian taskon, oni estos rekompencata; se venas printempo, degelas riveroj; se foriras la katoj, festenas la ratoj²; se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos².* Tian kazon oni trovas plejofte en proverboj aŭ leĝaj ordonoj: *se iu verŝos sangon de homo, lia sango ankaŭ estos verŝita².*

La kazo teoria ofte konfuziĝas kun la reala kondiĉo, ĉar la teorian supozon oni povas prezenti ankaŭ kiel kutime okazantan agon (*eterna prezenco*). Oni do ofte povas uzi *kiam* anstataŭ *se*: *kiam foriras la katoj, festenas la ratoj; kiam venas printempo, degelas riveroj.*

Rim. I. Tien ĉi oni povas klasi ankaŭ la kazon teorian de la komparaj-supozaj subprop-oj (vd. § 263).

3. *Kazo ebla.* La subprop-a ago estas supozata, sed ebla. La efektiviĝo de la ĉefprop-a enhavo estas eventuala: se la supozo praviĝas, ĝi realiĝos; se la supozo malpraviĝas, ĝi ne realiĝos. Temas ĉiam pri aparta, speciala okazo. La *modo* estas indikativo: *se vi faris vian taskon, mi vin rekom-*

* Ĝi estus graŭ ke: *graŭ ke vi ne havas tempon, ni prokrastas la aferon.* Sed *graŭ*, kiel ni diris (§ 201, piednoto), ne estas uzata.

pencos. Se ambaŭ prop-oj estas en preterito aŭ futuro, la kondiĉo, logike, antaŭas la konsekvencon, do ne estas necese signi aparte la antaŭecon: *se vi faros vian taskon, mi vin rekompencos; se li skribis la leteron, certe li ĝin jam forsendis*.

Tia ebla supozo povas funkcii ankaŭ kiel subprop-o subjekta. Tiajn oni anoncas en la ĉefprop-o per tio. Tiaokaze se plenumas samtempe la funkcion de se (*supoza*) kaj ke (*eksplika*): *se li vere agis tiel malprudente, tio havos por li malagrablajn sekvojn; se li diris tion, tio pruvas nur lian stultecon; se li mortis, tio estas granda malfeliĉo*. (Oni subkompremas: *se estas vere, ke...*)

Ankaŭ tie ĉi, la ĉefprop-o ĉiam resumas la enhavon de la subprop-o per tio.

Al la kazo ebla apartenas ankaŭ la okazoj pritraktitaj sub § 232, I. c.: *estus bone, se li venus*.

Rim. II. La kazo ebla de la supozaj-komparaj subprop-oj unuigas en si la kazon teoriantan kaj la kazon eblan (vd. § 263, 2.).

Anstataŭ se oni povas uzi ankaŭ kondiĉe ke (se oni volas akcenti la nepran kondiĉan interdependon) kaj supoze ke (se oni volas akcenti la supozitecon): *mi iros tien nur, kondiĉe ke oni min speciale invitos; supoze ke ĉio prosperos, vi sukcesos*.

Rim. III. Supozante ke havas alian signifon; ĝi montras kaŭzan interrilaton (ĉar mi supozas, ke...); *supozante, ke vi bone faris la tradukon, mi ĝin ne trarigardos*. Kp. § 183, Rim. III.

Rim. IV. Post kondiĉe ke oni trovas kelkfoje *volitivon*, ankaŭ ĉe Z. Tio estas pravigebla, kiam oni forte insistas pri la plenumo de la kondiĉo: *mi al vi pardonos, kondiĉe ke vi neniam plu kondutu tiel malbone*. Sed aliflanke, oni devas konsideri, ke la kondiĉon metitan oni imagas kiel netan fakton, sendependan de tio, ĉu oni ĝin plenumas aŭ ne. Krome, kondiĉe ke estas ĉiam anstataŭigebla per se, kaj post se oni certe ne metus volitivon ĉi-okaze. Oni do nepre ne eraras, se post ĝi oni metas ĉiam simplan indikativon: *mi helpos vin, kondiĉe ke (se) vi min obeOS; ili fariĝis Esperantistoj, kondiĉe ke estos faritaj reformoj²*.

4. *Kazo fiktiva*. La supozo estas neebla aŭ evidente nefakta, do ankaŭ la konsekvenco ne povas efektiviĝi. Modo: kondicionalo en ambaŭ prop-oj: *se vi estus farinta vian taskon, mi vin rekompencos* (vi ne faris vian taskon); *se li estus tie ĉi, ni intertraktus* (li ne estas tie ĉi).

Rim. V. Tien ĉi oni povas klasi ankaŭ la kazon fiktivan de la komparaj-supozaj subprop-oj (vd. § 263, 3.).

La kazo ebla kaj la kazo fiktiva ne estas klare distingeblaj en la futuro, ĉar pri futura ago oni povas esti nek tute certa, nek tute neanta. Tial anstataŭ futura indikativo oni povas uzi simplan kondicionalon, precipe se oni volas insisti pri deziro aŭ pri la eventualeco de la ago: *se vi helpus min, mi estus al vi tre danka; se li mortus, tio estus granda malfeliĉo* (vd. supre, kazo ebla, dua alineo); *se vi farus vian taskon, mi vin rekompencus*.

Tial iafoje oni trovas ankaŭ miksiĝon de ambaŭ formoj: *eĉ se ili suprenirus al la ĉielo, mi de tie depuŝos ilin!*² *se vi flugus en la ĉielon, li tie estos! se vi irus en la inferon, li tie denove estos*². Sed oni uzu futuron, se el la teksto ne estas klare, ĉu ne temas pri fiktiva supozo prezenca: *se li ĉeestos, ni intertraktos* (ĉar "se li ĉeestus" signas ne futuran eventualecon, sed tion, ke li nun ne ĉeestas).

Z. kaj slavaj verkistoj ofte uzas kondicionalon simplan anstataŭ perfektan. Tio neniel estas aprobebla, ĉar ĝi ofte estigas konfuzon pri la tempo. Ekzemple: *se la esp-istaro konjektus, ke la Delegacio havas la rajton reformi, certe ili ne laborus por la Delegacio*. Tie ĉi oni komprenas, ke la esp-istoj ne suspektas kaj laboras, kvankam efektive ili ne suspektis kaj laboris. Do devas teksti: *se... estus suspektintaj... ne estus laborintaj*.

Por eviti la tro pezan duoblan formon kompleksan, oni povas uzi la simplan formon kondicionalan en la subprop-o kaj lasi la difinon de la tempo al la ĉefpredikato sola. Sed ĉi lasta nepre devas esprimi la tempon perfektan. La ĝusta formo de la supra frazo do estas: *se la esperantistoj suspektus..., certe ili ne estus laborintaj*. Aŭ: *mi stumblis je ŝtono, kaj se li ne kaptus min, mi estus falinta en la abismon; se ni ne prokrastus, ni jam du fojojn estus revenintaj*². Tia uzado ja kontraŭas al la regulo pri verbotempoj, kiuj en la supozaj subprop-oj devas esti absolutaj, sed almenaŭ forigas ĉian malklarecon pri la efektiva tempo de la okazaĵo.

Malpli bona estas la regulo, ke oni indiku la pasintan tempon per perfekta kondicionalo ĉiam en la unua prop-o, eĉ se tiu estas la subprop-o. Nome, tiaokaze povas estiĝi konfuzo pri la ĉefprop-a tempo: *se vi estus lin helpinta, li ne bankrotus* — ĉi tie ne estas klare, ĉu li jam bankrotis, aŭ nur bankrotos. Male: *se vi helpus lin, li ne estus bankrotinta* estas nemiskomprenebla, ĉar la kondiĉo ĉiam antaŭas la konsekvencan fakton.

Alia rimedo eviti la duoblajn tempojn, kompleksajn, estas la uzo de *particip-adverbo*. Ĝi estas uzebla nur, se la subjektoj identas. Prezenca participo respondas al la ĉefpredikata tempo, preterita signas antaŭtempecon: *havante pluvombreton, mi elirus malgraŭ la pluvo; havante pluvombreton, mi estus elirinta malgraŭ la pluvo; farinte mian laboron, mi estus trankvila*. En tiaj participoj la fiktivecon montras nur la ĉefpredikata kondicionalo.

Por tiaj okazoj oni povus apliki la participon kondicionalan, kelkfoje jam provitan: *havante pluvombreton, mi elirus... konunte lin, mi ne estus lin fidinta*.

Ĉe la indikativa aŭ volitiva ĉefpredikato la participadverbo povas montri supozon teoriantan: *en infero loĝante, kun diabloj ne disputu*² (se vi loĝas en la infero).

II. Supozon *separativan* oni esprimas per **krom se**, **escepte se**: *ĉio prosperos, escepte se intervenos io neatendita; krom se min retenos grava laboro, mi vizitos vin*.

III. Supozajn *dependajn demandojn* anoncas laŭ tio en la ĉefprop-o: *oni vin respektos laŭ tio, kiel vi kondutos; ni vestos nin laŭ tio, ĉu la vetero estos varma aŭ malvarma*. Tiajn subprop-ojn laŭforme oni povus klasi ankaŭ inter la manier-adjektaj.

Rim. VI. Oni ne uzu laŭ tio se, ĉar per se ne povas esti enkondukita demando en E-o.

IV. *Elipsaj* subprop-oj. Se la subjektoj estas identaj, oni povas ellasi *li*, (*ŝi*, *ĝi*) estas: *ĉion venkas la virino, se ĉarma; tiu sciigo, se vera, estas miriga*. Eventuale eĉ ĉe subjektmalsameco, en intermetita prop-o: *la vinon, se bona, ni trinkos*.

V. La *demonstrativo* de *se* estas *tiukaze, tiuokaze*, sed ilin oni apenaŭ uzas. Plejofte *ĝi* estas same superflua, kiel la *Z-a tiam*: *se la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi JE*. Do, eĉ *se tiam* kiel demonstrativo ne estas rigardebla kiel nekorekta, oni evitu ĝin kiel nenecesan balaston.

Tamen *tiam* estas bezonata, kiam oni elipsas la supozan *se*-propozicion: *oni povas uzi tiun formon, sed tiam oni devas atenti...* (sed se oni uzas, oni devas...).

Rim. VII. Kiel oni vidis, post *se* oni uzas jen indikativon, jen kondicionalon. Kelkfoje oni legas u-modon; ekzemple ĉe *Z.*: *se mi faru riverencon, mi elektas potencon*². Sed tio estas iom nekutima, same kiel ekz-e la esprimo: *se mi ne parolu pri tio...* Fakte, en la lasta frazo tute ne temas pri voleco, sed pri simpla kondiĉo. Preferinde estas uzi tie ĉi infinitivon: *se ne paroli...* (vd. § 268, Rim. I).

Alia, same ne tre kutima uzado de u-modo post *se* estas, *se* oni volas per *ĝi* esprimi la supozatan volon de la ĉefprop-a subjekto. Tia *se* do staras anstataŭ la elipsa *se...* volas ke: *helpu, se (vi volas, ke) ni estu pretaj; li jam venu, se (li volas, ke) ni ne malfru*. La ĉefpredikato estas ĉiam u-moda verbo, aŭ devas: *vi devas helpi, se (vi volas, ke) ĉio prosperu*. Tia konstruo estas tute logika, sed iom konfuza pro sia koncizeco. Tial, almenaŭ en prozo, *ĝi* estas evitinda.

Subpropozicioj koncedaj

258

La subprop-oj koncedaj esprimas ion, *malgraŭ* kio okazas la ĉefprop-ago. Subjunkcioj: *kvankam, malgraŭ (tio) ke, spite (de tio) ke*, eĉ *se*. Eventuala korelativo en la ĉefprop-o: *tamen (neniam sed)*.

Ekzemploj: *la herbo estas tute seka, kvankam antaŭ nelonge pluvis; mi vidas nenion, kvankam ĉio estas luma; estis varmege, malgraŭ ke la suno staris jam malalte; li faras tion, spite ke oni malpermesis; ŝnuro ŝiriĝas, eĉ se ĝi estas dika; bonuloj agas ĉiam juste kaj honeste, eĉ se nenian profiton ili havas el tio*.

Oni uzas *kvankam* ĉe konstato de fakto; *malgraŭ ke*, *se* oni volas pli emfazi kontrastan fakton; *spite ke*, *se* oni indikas intencan kontraŭecon; eĉ *se*, *se* la malgraŭaĵo estas nur supozita. Tio, tamen, ne ĉiam estas severe observata.

Kelkfoje la subjunkcio tute mankas, *ĝin* anstataŭas *tamen* en la alligita prop-o. Tiam la propozicioj estas kunorditaj-adversaj: *oni lin invitis,*

tamen li ne venis.

I. Ĉe la koncedprop-oj oni trovas kazojn analogajn al tiuj de la prop-oj supozaj (vd. § 257).

1. *Kazo reala.* La malgraŭaĵo vere ekzistas. Subjunkcioj: *kvankam, malgraŭ ke, spite ke.* Modo: indikativo: *kvankam vi rapidis, vi ne estas preta; multaj volapükistoj baldaŭ transiris sur la flankon de Esp-o, malgraŭ ke ili estis jam forte kunligitaj kun Volapük.*

2. *Kazo teoria.* La malgraŭaĵon oni teorie supozas, por montri ties malgraŭan interrilaton al alia ago. Subjunkcio: *eĉ se* (plejofte); modo: indikativo: *eĉ se mankas la forto, tamen laŭdinda estas la volo.*

3. *Kazo ebla.* La malgraŭaĵo estas supozita, sed ebla. Subjunkcio: *eĉ se* (plejofte). Modo: indikativo aŭ (por la futuro) eble kondicionalo: *eĉ se vi faris multe, vi ne faris ĉion eblan; eĉ se vi rapidos (rapidus), vi ne estos (estus) preta; ĉiujn novajn regulojn, kies akcepto iom plimalfaciligus la lernadon de la lingvo, ni ne devas akcepti, kvankam ili per si mem eĉ estus tre belaj².* Ĉe Z. oni trovas ankaŭ **kiam** en tiu senco: *kiam nia lingvo havus eĉ milionojn da adeptoj, sed ne havus sufiĉe fortan fundamenton k o r p a n, ni ne povus ankoraŭ esti tute certaj, ke ia neatendita vento ne forblovos nian tutan laboron.*

Rim. Ĉe *futura kazo ebla*, oni povas uzi, por plia emfazo, ankaŭ *kvankam* kun volitivo, precipe se la ĉefprop-o estas negacia: *kvankam ĉiuj min ataku, mi ne cedos; la rimon, kvankam ĝi estu plej bela kaj frapa, oni ne preferu al la pura senco de l' verso.* Kelkfoje oni eĉ ellasas *kvankam* kaj la koncedon montras tamen en la ĉefprop-o: *ataku min ĉiuj, mi tamen ne cedos.*

4. *Kazo fiktiva.* La malgraŭaĵo estas supozita, sed ne ebla, ne fakta. Subjunkcio: *eĉ se.* Modo: kondicionalo: *eĉ se vi estus rapidinta, vi ne estus preta; eĉ se la ĉielo defalus, li ne ektimus; ĉia elekto de ia alia lingvo estus por ili rekte neebla, se ili eĉ volus ĝin elekti²; se eĉ mi volus iam freneze fari tian senrajtan kaj pereigan faron, ĉiuj esp-istoj povas kontraŭmeti al mi la Bulonjan Deklaracion².*

Pri la *modo* en la futuro validas la samo, kiel ĉe la supozaj subprop-oj (vd. § 257, 4.).

Anstataŭ konceda prop-o oni povas uzi ankaŭ eĉ kun participadverbo, se la subjekto de l' du prop-oj identas: *eĉ farinte ĉion eblan, li ne sukcesis* (kvankam li faris ĉion eblan; kazo reala); *eĉ farinte ĉion eblan, li ne estus sukcesinta* (eĉ se li estus farinta ĉion eblan; kazo fiktiva). Kiel oni vidas, la kondicionala senco de l' participo sekvas nur el la kondicionalo de la ĉefpredikato. Komparu ankaŭ: *eĉ savita, mi estis jam nur ombro²; eĉ atakite, mi ne respondus.*

II. Koncedaj prop-oj estas ankaŭ la prop-oj enkondukitaj per rilativo kun *ajn* (kiel *ajn*, *kiom ajn*, *kia ajn*, *kiam ajn* ktp.). Ĉe ili neniam oni uzas specialan koncedan subjunkcion: *kiel ajn li fanfaronas, li estas sentaŭgulo; kien ajn mi rigardis, mi vidis nur dezerton.* (Kazoj realaj); *kiel ajn lerte oni mensogas, fine tamen oni estos senmaskigita.* (Kazo teoria); *kian ajn prezon oni proponos, mi ne vendos la domon; kia ajn*

*penso povus resti ĉe vi, li neis kaj tio devas sufiĉi!*²; *la afero pli aŭ malpli frue efektiviĝos, kiom ajn la inerciuloj babilus kontraŭ ĝi*². (Kazo ebla); *kiel ajn vi estus peteginta, li estus vin rifuzinta*. (Kazo fictiva). Pri la evito de du kompleksaj kondicionaloj vd. § 257.

III. Oni trovas post kvankam kelkfoje ankaŭ elipsojn kun la ellaso de li (ŝi, ĝi, ili) estas (se la subjektoj identas): *kvankam laca, li laboris plu; la vetero, kvankam malvarma, ne estas malagraba*. Oni povas subkompreni ankaŭ la ĉefprop-an subjekton plus predikaton: *la taskon, kvankam pene, li plenumis; fine, kvankam malfrue, li venis*. Se la subjektoj ne samas, kvankam povas funkcii kvazaŭ adverbo: *la fruktojn, kvankam acidajn, ili manĝis*. (Atentu pri la akuzativa kazo!).

Post eĉ se oni povas ellasi ĝi estas eĉ ĉe neidenteco de subjektoj: *la sorton, eĉ se kruela, oni devas toleri*.

IV. Koncedajn propoziciojn alternativajn oni enkondukas per ĉu... ĉu...: *ĉu li konsentas, ĉu li malaprobas, la afero estos farita*. Tre oftaj estas la elipsoj: *ĉu kun li, ĉu sen li, ni iros; ĉu vi volas, ĉu ne, mi lin invitos; ĉu li estas amiko, ĉu malamiko, mi iros al li renkonte*. Oni uzu ĉi-okaze ĉiam ĉu... ĉu, sed aliokaze (dependaj demandoj) ĉiam ĉu... aŭ... Do: *ĉu li estas amiko aŭ malamiko, ni vidos; ĉu li konsentas aŭ malaprobas, li ne diris al mi*. Kp. § 222 kaj 230, 3.

B. — SUBPROPOZICIOJ ORIGINALAJ KAJ REZULTAJ

259

La origin- kaj rezultadjektaj subpropozicioj povas esti

1. *Eksplikaj*. Subjunkcio: ke. Demonstrativo: tio kun la respektiva prepozicio: *la katastrofo devenis el tio, ke unu rado de la aŭto elfalis* (origino); *mi ŝanĝis mian decidon je tio* (en tion), *ke mi restos hejme* (rezulto).

2. *Rilataj*. Subjunkcioj: rilatpronomoj Demonstrativoj: tio aŭ tiu kun la respektiva prepozicio: *ĉio ĉi rezultas el tio, kion mi ĵus eksplikis* (origino); *la feino sin transformis en tion, kio ŝi antaŭe estis* (rezulto).

Demonstrativojn oni konservas. Eventuale ili estas ellaseblaj, se ili havas la saman prepozicion kun la rilatpronomo: *la feino povis sin transformi en kion ŝi volis* (en tion, en kion).

Rim. La rezulton en E-o ofte esprimas simpla predikativo, tial la rezult-propozicioj ofte aperas sub la formo de prop-o predikativa: *la vetero iĝis tia, kian ni esperis*.

Pri la rezulta kiel vd. § 200 kaj 204.

SUBPROPOZICIOJ MODALAJ

260

La subprop-oj modalaj havas la funkcion de ĉefprop-a modala adjekto. Ili do difinas la *manieron, kaŭzon aŭ celon* de la ĉefprop-a ago. Pri la *verbotempoj* vd. § 267-271.

A. — SUBPROPOZICIOJ MANIERAJ

Oni povas distingi kvar specojn de manier-adjektaj subprop-oj: 1. subprop-ojn *manier-indikajn*; 2. subprop-ojn *komparajn* (kiuj esprimas la manieron de la ago per komparo al alia ago); 3. *instrument-indikajn* (kiuj esprimas la manieron de la ago per la instrumento, rimedo, persono, per kiu la ago okazas); 4. *konsekvenc-indikajn* (kiuj esprimas la manieron de la ago per la konsekvenco, kiun ĝi havas).

Subpropozicioj manier-indikaj

261

La subpropozicioj manier-indikaj povas esti:

1. *Eksplikaj*. Subjunkcio: **ke**. Demonstrativoj en la ĉefprop-o: **tiel** aŭ **tiamaniere**: *tiel li foriris, ke li eĉ ne rerigardis; la laboro estis farita tiamaniere, ke ĉiu faris sian taskon aparte.*

Ĉe subjekt-identeco oni povas uzi konstruon particip-adverban: *li foriris eĉ ne rerigardante; ĉiu laboris farante sian taskon aparte.*

2. *Rilataj*. Ilin enkondukas kiel. Demonstrativoj: **tiel** aŭ **tiamaniere** (tre ofte ellasita): *li vivas, kiel al li plaĉas; li kuris kiel rapide li povis; ili faros ĝin tiel baldaŭ, kiel ili povas.*

Tiaj prop-oj estas transformeblaj en simplajn adjektojn kun **laŭ**: *li vivas laŭ sia plaĉo; li kuris laŭpove rapide; ili faros ĝin plej baldaŭ laŭ sia povo.*

Laŭforme similas al la manier-indikaj subprop-oj, tiuj subprop-oj enkondukataj per **kiel**, kiuj indikas ne la manieron de la ago, sed la informon, sciigon, laŭ kiu la ago okazis (inform-indika kiel): *kiel mi aŭdis, li mortis; kiel oni diras, li foriris.* En ili **kiel** do staras anstataŭ **laŭ tio**, **kion**, ekz-e: *laŭ tio, kion mi aŭdis, li mortis.* Kelkfoje oni renkontas ĉisence laŭ anstataŭ **kiel**: *laŭ mi scias, li estas profesoro.* Tio estas malĝusta, ĉar **laŭ** povas esti uzata nur prepozicie.

Kiom, uzata anstataŭ **kiel** en tiaj frazoj, havas limigan signifon (striktiga **kiom**): *kiom mi scias, li fiaskis pri tiu entrepreno (= laŭ mia ne tute certa scio, li fiaskis); sed la apero, kiom mi komprenas, al nia land' malbonon antaŭdiras²; el Aŭstralio, kiom mi memoras, mi ricevis leterojn²; mi provas batali kontraŭ la malkontentuloj, kiom mi povas²; li devas — kiom tio estas ebla — uzi la lingvon kiom eble plej neŭtralan².* Kp. § 88.

Pri **laŭ tio ĉu**, **laŭ tio kiel** vd. § 257.

Post percept-verboj kaj sciig-verboj oni povas eksplicite per **kiel** la enhavon de l' perceptado aŭ sciigo kaj aludi samtempe al ties maniero: *mi vidis, kiel li falis; li rakontis, kiel okazis la afero.* Pri la verbotempoj vd. § 271, Rim.

Subpropozicioj komparaj

262

Per la subprop-oj komparaj oni esprimas similecon aŭ egalecon. Ili estas tre diversspecaj, kaj pro ilia granda varieco oni devas fari inter ili plurajn dividojn kaj subdividojn. Unue oni povas ilin dividi en la du kategoriojn,

t.e. en subprop-ojn *indikajn* kaj *supozajn*: per la unuaj oni komparas al io fakta, per la duaj oni komparas al io supozita (ebla aŭ fiktiva).

I. Indikaj komparoj.

Ankaŭ inter la indikaj komparoj oni povas distingi du specojn: en la *komparoj samgradigaj* oni esprimas simple la similecon aŭ egalecon; en la *komparoj disgradigaj* krome oni indikas, ke ia ago, kvalito, maniero aŭ kvanto, kvankam simila al la alia, estas tamen pli aŭ malpli intensa, forta aŭ granda ol ĉiu tiu.

A — **Samgradigaj komparoj.** La samgradigajn komparojn enkondukas plejofte kiel, eventuale kiom aŭ kia, kaj povas anonci tiel, tia aŭ tiom: *mi amas vin tiel, kiel vi amas min*. Oni tiamaniere povas interkompari agojn, kvalitojn, aĵojn, manierojn, kvantojn: per tio doniĝas kvin sub-specoj de samgradigaj komparoj, al kiuj oni povas ankaŭ aldoni la komparojn paraleligajn kaj la identigajn.

1. **K o m p a r o j d e a g o j.** En ili oni komparas la ĉefprop-an agon al la subprop-a. Plejofte la du komparataj agoj estas esprimitaj per la sama verbo, do la komparo estas farita ne rekte, per la predikatoj, sed helpe de aliaj frazelementoj. Tiuj *samverbaj komparoj* preskaŭ ĉiam estas elipsaj: oni ne ripetis la verbon en la subprop-o. Pli maloftaj estas la *diversverbaj komparoj*, ĉe kiuj la agoj de la ĉefprop-o kaj subprop-o estas esprimitaj per malsamaj verboj.

a) *Samverbaj komparoj.* Kiel ni diris, ĉe ili la komparon efektivas iu subprop-a frazelemento (subjekto, objekto, adjekto): ili speciale karakterizas la subprop-an agon, kiun, kun ĝia speciala karakterizeco, oni komparas al la ago ĉefprop-a. Tiujn karakterizajn subprop-ajn frazelementojn oni povas nomi *kompariloj*. Ekz-e en: *Petro naĝas kiel fiŝo* (naĝas), la komparilo estas la subprop-a subjekto (*fiŝo*), kaj ĝi, per la speciala karakterizeco de sia naĝo, kvalifikas la naĝon de Petro.

Ĉe la samverbaj komparoj oni trovas la sekvantajn okazojn:

aa) La subprop-a komparilo estas la subjekto, aŭ la subjekto plus komplemento; tiaokaze oni kompletigas la elipsan subprop-on per la ripeto de la ĉefprop-a predikato: *li tremas kiel aŭtuna folio^z* (tremas); *kiel ponardo* (pentras, tiel) *en min penetras ĉiu vorto^z*; *li komprenas predikon, kiel bovo muzikon^z* (komprenas); *li amas lin, kiel patro filon* (amas).

bb) La komparilo estas objekto aŭ adjekto (subjekto mankas en la subprop-o). Tiaokaze la elipsan subjekton de la subprop-o reprezentas oni: *li amas lin kiel* (oni amas) *filon*; *ŝi zorgis pri ŝi, kiel* (oni zorgas) *pri filino*; *li batis per la pugno, kiel* (oni batas) *per martelo*; *tiuj kamparanoj kulturis la teron eĉ nun, kiel* (oni ĝin kulturis) *en la mezepoko*.

cc) La komparilo estas objekto aŭ adjekto, kaj la ago de la elipsa subprop-a verbo estas la alitempe farita ago de la ĉefprop-a subjekto: *ili sin amas eĉ nun, kiel* (ili sin amis) *en siaj mielsemajnoj*; *li amas sian duonfilon, kiel* (li amis) *sian filon mortintan*; *li kondukas en la societo, kiel* (li kondukis) *en la kazerno*.

Rim. I. Kiel la kompletigo montras, la esprimitaj subprop-aj frazelementoj devas havi la saman kazon, kiun tiuj ĉefprop-aj frazelementoj, al kiuj ili rilatas: *li traktis lin kiel krimulo* (komparilo subjekta, do nominativa); *li traktis lin kiel krimulon* (komparilo objekta, do akuzativa).

dd) Tre malofta estas la jena okazo: la ĉefprop-a subjekto kutime faras ion aŭ havas ian staton, kaj tio karakterizas lian tiaman sintenon; ĉi tiun karakterizan sintenon oni komparas al alia aktuala ĉefprop-a ago. Tia-okaze tiun kutiman faron aŭ staton oni esprimas per tempa subprop-o kaj anoncas en la ĉefprop-o per *tiam*. La kompletigo okazas per la ripeto de la ĉefprop-a subjekto plus predikato: *vi komplimentas, kiel* (vi komplimentas) *tiam, kiam vi amindumas*; *li ŝanceliĝas, kiel* (li ŝanceliĝas) *tiam, kiam li estas ebria*. Tiajn kutimajn agojn aŭ statojn oni povas enkonduki ankaŭ per *se*: *vi komplimentas, kiel se vi amindumas*; *li parolis al mi per olea voĉo, kiel se li predikas*. En tiaj frazoj, *se* anstataŭas *kiam*, do esprimas ne supozon, sed realaĵon. Ĝuste tial, *tia kiel se* (= *kiel kiam*) ne povas esti anstataŭigita per *kvazaŭ* (Vd. § 263, 3.).

b) *Diversverabaj komparoj.* La verboj de la ĉefprop-o kaj subprop-o estas sence parencaj sed malsamaj. Tiajn komparojn oni trovas preskaŭ nur en poezio: *kiel glacio per la suna varmo degelas, tiel lia spit' rigida al la insista panja peto cedis*; *kiel la vircervo kun la saga vundo kuras bruldolore al arbara fundo, kuras al la fonto por freŝiĝi per ĝi, kuras balzamherbon por la vundo serĉi, sed, ho ve, la lito de la fonto sekas, la sanigan herbon vane li serĉegas, ŝiras lin la dornoj, pikas branĉo pinta, ke eĉ pli svenemas nun la kompatinda – tiel Nikolao vagis...*

c) *Komparoj imagaj.* Ili komparas la ĉefprop-an agon aŭ staton al ago aŭ stato ekzistanta nur en imagoj, t.e. opiniata aŭ intencata. La imagata stato ne estas esprimita, nur la fakto de la imagado, tial tiuj ĉi komparoj ŝajnas diversverabaj, nur ĉe la kompletigo montriĝas ilia samverbeco: *li estas punita, kiel li meritas* (esti punita); *ĉio okazis, kiel mi deziris* (ke ĝi okazu); *tio ne estas tiel facila, kiel oni opinias* (ke ĝi estas facila); *ili ne restigis tian riĉecon, kiel la homoj asertis*² (ke ili restigis).

2. Komparoj de kvalitoj. La kvalitkomparoj komparas la kvaliton de ĉefprop-a frazelemento al tiu de la subprop-a subjekto. La komparata kvalito en la ĉefprop-o povas esti esprimita

a) per adjektiva epiteto: *tiu vino, acida kiel la vinagro, ne estas vendebila*; *ŝi havas okulojn blujajn kiel cejano*; *mi vidis tie melonon grandan kiel barelo*. Kiel oni vidas, la epiteton oni devas postmeti, ke ĝi staru senpere antaŭ **kiel**.

b) per predikativo: *ŝiaj okuloj estas nigraj kiel nokto*; *mi trovis la vinon acida kiel vinagro*.

c) ĝi povas esti elipsita, ĉar divenebla el la kunteksto: *la regimentestro estas por siaj soldatoj kiel bona patro*² (zorganta kiel...); *la estrino de la nacioj fariĝis kiel vidvino*² (senhelpa kiel...); *ili fariĝos kiel tute ne ekzistintaj*² (forgesitaj kiel...); *mi faros vian idaron kiel polvo de la tero*² (grandombra kiel...). Oni povus tiajn konstruojn rigardi ankaŭ

nerektaj predikativoj; tamen, ke ĉi tie temas pri elipso, tion montras, ke uzante komparon disgradigan, oni devus meti la ĉefprop-an epiteton: *la estrino de la nacioj fariĝis pli senhelpa ol vidvino*.

La kompletigo de la kvalitkomparoj okazas per la ripeto de la ĉefprop-a epiteto plus estas: *melonon grandan* (kiel granda estas) *barelo*; *mi faros vian idaron kiel* (grandnombra estas) *polvo de la tero*. La komparilo do estas ĉiam subjekto, sekve nominativa, eĉ se ĝi rilatas al ali-kaza ĉefprop-a frazelemento: ... *vino n acidan kiel vinagro*.

3. K o m p a r o j d e a ĵ o j. Interkomparo de aĵoj povas okazi tri-maniere:

a) per predikativa komparilo antaŭata de **kiel**: *la urbo estas kiel arbaro^z; li fariĝis kiel ŝtono^z; ne estu kiel ĉevalo^z; via justeco estas kiel la montoj de Dio^z*.

b) per subprop-a komparilo plejofte anoncata aŭ remontrata en la ĉefprop-o per **tia**, **tia sama** aŭ **la sama**. Ĉi-okaze ekzistas du eblaĵoj:

aa) la komparilo konsistas en unu frazelemento: *tia sama homo, kiel mi^z; Emilio havas sur si la saman veston, kiel tiam^z; la uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en aliaj lingvoj^z; mi ĝojas, ke vi havas tian saman opinion, kiel mi^z*.

bb) la subprop-a komparilo staras en senelipsa subprop-o: *restu ĉiam tia, kia vi estas^z; kia estas lia nomo, tia li mem estas^z; ĝi estas tia sama komencejo, kiaj estas ĉiuj la aliaj komencejoj^z; vi troviĝas en tia sama situacio, en kia antaŭ du monatoj troviĝis mia kuzino^z; regis frostoj, kian ni ĉe ni ne havis^z; kia estas la viro, tia estas lia forto^z*.

En proverbaj esprimoj, oni povas elipsi "estas la": *kia ago, tia pago^z; kia respondo, tia demando^z; kia fripono, tia bastono^z*.

Kiel oni vidas el la supraj ekzemploj, Z. uzis konsekvence **kiel**, se post ĝi staras nur unu frazelemento (egale ĉu subjekto aŭ adjekto), kaj **kia**, se la komparon esprimas senelipsa frazo, aŭ, se, en proverbaj diroj, estas estas elipsita kaj en la ĉefprop-o kaj en la subprop-o. Laŭ de Hoog, kiu tion vaste demonstris, **kiel** en tiuj okazoj, kiam ĝi staras antaŭ sola vorto, estas prepozicio. Tamen, pli ĝuste estas rigardi ĝin *kompara partikulo*: tia estas la angla *as*, la franca *comme*, la germana *wie* kaj *als*, la hungara *mint*, la rusa *kak* (kaj – la esperanta *ol*). Kiel en tiuj lingvoj, do vere tute internacie, oni tute ne bezonas kompletigi la frazelementon je plena prop-o, kaj por tio anstataŭigi **kiel** per **kia** estas. Tiu kompletiga teorio kondukis al la ne-zamenhofa lingvuzo, kiun ankaŭ ni mem rekomendis en la dua eldono, ke en tiaj okazoj oni uzu **kia** anstataŭ **kiel**, ĉar tio estas "pli gramatika".

La zamenhofa **kiel** estas do plene pravigebla, kaj ĝi havas ankaŭ grandajn avantaĝojn. Tion montras de Hoog per citaĵo el Teo Jung: "Petro estas alta **kiel** giganto, li estas filo de la sama popolo **kiel** mi, kaj loĝas en la sama urbo **kiel** mi, kie li vizitis la saman lernejon **kiel** mi. Dum la pasinta somero li intencis vojaĝi en la saman regionon **kiel** mi, eĉ je la sama tempo **kiel** mi, sed li devis rezigni tiun intencon pro la sama kaŭzo

kiel mi. Tial ni nun kune iros al la Universala Kongreso, kiu ĉi-jare estos en la sama urbo kaj je la sama dato, *kiel* la Olimpaj Ludoj". Uzante en ĉi tiu teksto anstataŭ *kiel* ĉiam la formon respondan al la bezonoj de la teoria kompletigo (... alia *kia* giganto... filo de la sama popolo, *kies* mi... en la sama urbo, *kie* mi... la saman lernejon, *kiun* mi ktp.) la teksto fariĝus multe pli peza, kaj sian konceptanton kelkfoje devigus eĉ al kaprompo.

Rim. II. Por pasiaj kompletigemuloj oni povas prezenti ankaŭ tian solvon de la problemo, kiu ebligas la kompletigon. Nome oni povas rigardi *kiel* kompara partikulo (analoge al *ol*), post kiu oni metas teorie la respektivan rilatpronomon aŭ subjunkcion. Do: *vi havas tian saman opinionon kiel* (kian havas) *mi*; *vojaĝi en la saman regionon kiel* (kien vojaĝas) *mi*, *kaj je la sama dato kiel* (kiam vojaĝas) *mi*. Se al iuj tio estas stranga, ilin trankviligu, ke en la hungara lingvo tia frazkonstruo estas ebla, kaj ne malofte uzata, precipe en la ordinara parolo, kiam per vortplimultigo oni intencas gajni tempon por pensado: *olyan ruhát veszek, mint te* (= tian veston mi aĉetos, kiel vi); *olyan ruhát veszet, mint amilyet te* (= tian veston mi aĉetos, kiel kian vi).

4. Komparoj de maniero. Per la manier-komparoj oni intertaksas agojn en si mem diversajn laŭ ilia komuna maniero aŭ laŭ certa konsidero: *diskuti kun li estas same senutile, kiel* (senutile estas) *draŝi venton*; *li mortigis tiun homon tiel senemocie, kiel oni estingas kandelon*; *disiĝi estas tiel same dolore, kiel enterigi*; *li verkas siajn poemojn tiel turmente, kiel virino naskas infanon*. Oni povas la manier-indikan frazelementon ankaŭ elipsi: *disiĝi estas kiel enterigi*.

5. Komparoj de kvanto. La subjunkcio estas *kiom*, ĝin anoncas *tiom*: *kiom da kapoj, tiom da opinioj*²; *mi gajnis tiom, kiom vi perdis*; *kiom pli multe vi ricevis, tiom pli malmulte ricevis aliaj*; *la mondo ekzistos nur tiom da jaroj, kiom da versoj enhavas la Psalmoj*².

Parentaj al la kvanto-komparoj estas la mezur-komparoj, kiuj esprimas insiste, ke kvalitoj indikitaj en la ĉefprop-o kaj subprop-o estas egalaj: *ŝi ŝajnas preskaŭ tiel juna, kiel* (juna estas) *ŝia filino*; *la birdamaso estis tiel densa, kiel svarmo da abeloj*². Tiaokaze kelkaj uzas sisteme *kiom* anstataŭ *kiel* ("Tiom-malsano", laŭ de Hoog); tio impresas peze kaj ne estas rekomendinda, ankaŭ ne zamenhofa (Vd. § 88).

Al ĉi tiu kategorio apartenas ankaŭ tiuj propozicioj, en kiuj la intenso aŭ grado de *diversaj kvalitoj* estas komparata ĉe la sama persono aŭ aĵo: *ŝi estas tiel stulta, kiel bela*; *estu tiom feliĉa, kiom vi estas kompatema*².

Zamenhof uzas en la kvanto- kaj mezuro-komparoj *tiom same*, eĉ por granda emfazo *tiom same multe*; sed, se la komparilo estas sola frazelemento, li ĉiam enkondukas ĝin per *kiel*: *havante tiom same da talento, kiel mi...²*; *letero iris tiom same longe kiel hieraŭ*. *Kiom* li uzas nur, se temas pri efektiva kvanto: ... *fari por nia afero tiom same, kiom mi*²; *la lanterno estis vidinta eble tiom same multe, kiom la tridek ses sinjoroj urbaj delegitoj*². Kvankam ĉe li estas troveblaj pluraj *tiom multe* (*ne-*

niu scias tiom multe da historioj, kiel la dio de dormo^Z), ankaŭ en tiaj okazoj tiel multe ŝajnas pli plaĉa, ĉar pli flua.

6. **K o m p a r o j p a r a l e l i g a j.** Eĉ se ne laŭ senco, almenaŭ laŭ formo oni povas klasi inter la komparojn ankaŭ tiujn frazojn, kiuj montras, ke iu ago iras paralele kun alia: *kiel vi semas, tiel vi rikoltos; kiel vi faros vian laboron, tiel vi estos rekompencita.*

Ĉi tien apartenas ankaŭ la frazoj kun la konjunkcio-paro **ju pli - des pli**: *ju pli li perdis, des pli li riskis; ju pli pura estas la akvo, des pli videbla estas ĝia fundo.* Kp. § 123.

7. **K o m p a r o j i d e n t i g a j.** Ĉe la identigaj komparoj (propre kontraŭsenca afero), oni esprimas ne similecon aŭ egalecon, sed plenan identecon. Oni povas distingi du specojn de tiaj identigoj:

a) La unua speco estas analoga al la ago-komparoj. La komparilo estas enkondukita per *kiel*, sed ĉi tiu, perdinte sian komparan signifon, ĉi tie signas, ke iu frazelemento estas plene identa kun alia, enkondukita per *ĝi*. La identigo do estas komparo sole forme: la identiga *kiel* esprimas realan staton: *li venis kiel delegito* (li estis delegito efektiva kaj kiel tia li venis). Oni estus tentata kompletigi tiajn esprimojn, tiel same kiel ĉe la agokomparoj: *li venis, kiel delegito venas.* Sed per tio oni aliigas la sencon el identiga en komparan: do post la identiga *kiel*, kompletigo ne estas ebla. Tio montras, ke en tiaj okazoj *ĝi* ne estas subjunkcio, sed simple "liganta vorto", kaj la frazelemento staranta post *ĝi* ne estas parto de elipsa subprop-o, sed apartenas al la ĉefprop-o kiel stat-adjekto. Tial ĉi tiujn formojn ni pritraktis inter la *stat-indikaj adjektoj* (§ 200).

b) La dua speco estas analoga al la kvalit-komparoj: la identigon anoncas **tiu sama** aŭ **la sama**, kaj la identiga subjunkcio estas **kiu**: *mi restas ĉe tiu sama opinio, kiun mi esprimis antaŭ 8-10 tagoj^Z*. Tamen, se la identigo estas esprimita per sola frazelemento, la subjunkcio restas la "liganta vorto" *kiel*: *en la okuloj de la esperantistoj vi restos tiu sama sindona kaj multemerita Michaux, kiel antaŭe^Z*.

Rim. III. Oni povas propre distingi tri gradojn de intertakso:

a) simileco: *ombrite per tia sama hedero, kiel ĉi tie^Z; li estas tia, kiaj estas ĉiuj viroj^Z*.

b) egaleco: *vi estas tia sama homo, kiel mi; vi troviĝas en tia sama situacio, en kia antaŭ du monatoj troviĝis via kuzino^Z*.

c) identeco: *ŝi havis sur si eĉ la saman veston, kiel tiam^Z; la enhavo de la memuaro estas la sama, kiun mi jam sendis al vi^Z*.

Oni rimarku la konsekvencon uzadon de *kiel* antaŭ sola frazelemento, kaj tiun de **kia**, **kiu** antaŭ senelipsa prop-o. Escepte oni trovas: *ĉu tie troviĝas tia sama bela koltuko, kiel Kristino havas?^Z* (= kiel kian Kristino havas).

B – Disgradigaj komparoj. La disgradigajn komparojn enkondukas **ol**, kaj en la ĉefprop-o troviĝas vorto komparacia (**pli**, **malpli**), aŭ alimaniere esprimanta grado-diferencon (**preferi**), neegalecon, neidentecon (**alia**, **malsama**): *vi pensas alie ol mi* (pensas).

La strukturo de la disgradigaj komparoj estas la sama, kiel tiu de la samgradigaj; oni ofte povas transformi la unuajn en la duajn, anstataŭigante tiel per pli kaj kiel per ol: *mi amas vin tiel, kiel vi min; mi amas vin pli, ol vi min*. Tio tamen estas ebla nur, kiam la komparo montras sole la intensogradon de la ago aŭ de la kvalito. Sed kiam ĝi rilatas al maniero aŭ kvalito ne esprimita kaj montrata sole per la komparilo, oni devas ĝin ĉe la disgradigo aparte esprimi. Samgradige oni povas diri ekz-e: *ni staras unu apud la alia ne kiel fremduloj, sed kiel fratoj*², dum disgradige oni devus diri: *ni ne staru unu apud la alia pli indiferente ol fremduloj, sed pli ame ol fratoj*. Same: *li traktis lin pli aĉe ol krimulo; li traktis lin pli malestime ol krimulon*. (Kp. ĉi-supre Rim. I.).

Rim. IV. Sekve de tiu malsameco de subjunkcio inter la samgradigaj kaj disgradigaj komparoj, oni ne povas en Esp-o, same kiel en la latina aŭ la franca, kuntiri du tiajn diversajn komparojn en unu frazon: *il n'est ni plus rusé, ni même aussi adroit que moi* fariĝas: *li ne estas pli ruza ol mi, kaj ne estas eĉ tiel lerta, kiel mi*.

Ĉe la disgradigaj komparoj, oni trovas ĉiujn specojn, kiujn ni renkontis ĉe la samgradigaj.

1. A g o k o m p a r o j: *li atakis pli sovaĝe ol tigro; li rompis la hufferon pli facile ol infano kringon; li amas ŝin pli ol fratinton; ni sentas nin ĉi tie pli bone ol hejme; la afero progresas pli ol iam ajn; li hodiaŭ pli balbutas, ol li kutimas; li pli imponas per sia trankvilo, ol se li kolere kriegas; mi havas pli bonajn okulojn, ol vi pensas; taksi iun pli alte, ol li meritas*².

2. K v a l i t k o m p a r o j: *ni venis al vojo eĉ pli kruta, ol (tiu) kiun ni postlasis; li havas soifon pli grandan ol sablo; ŝia mieno estis pli acida ol citrono*.

3. M a n i e r k o m p a r o j: *lerni estas por li pli penige ol haki lignon; li depuŝis la zorgojn pli facile de si, ol oni forblovas flokon*.

4. A ĵ o - k o m p a r o j: *kun la tempo la formo de la lingvo estos eble alia ol tiu, pro kiu ni laboras*²; *nun ŝia rideto estis alia ol matene*²; *mi havas alian proponon, ol la ĵus prezentita; li havas malsaman karakteron, ol lia patro*. En ĉi tiuj ekzemploj la senco de alia estas: ne samkvalita, ne tia. Sed alia povas havi ankaŭ la senco: ne identa, ne tiu ĉi: *mi havas ankaŭ alian proponon, krom la dirita*. Tiam temas pri separativa adjekto (Vd. § 199). Tamen, ĉe negacio oni povas enkonduki la separativan adjekton ankaŭ per ol, ĉar laŭsence tiam ĝi fariĝas aĵo-komparo: *nia tuta vivo estas nenio alia, ol konstanta incensado por lia honoro*²; *estas por mi nenio pli bona, ol ke mi forkuru*².

5. K v a n t o k o m p a r o j: *vi ricevis pli multe ol mi; ŝi alnaĝadis multe pli proksimen, ol kiel kuraĝus iu alia*².

Same pri la du subspecoj: mezurkomparoj: *ŝi ŝajnas pli juna, ol ŝia filino*, kaj diverskvalita komparo: *li estis pli stulta, ol malica*.

6. K o m p a r o j p a r a l e l i g a j. Ĉi tie, kompreneble, oni ne povas paroli pri paraleligo, sed ĝuste pri malparaleligo; oni povus nomi tiujn komparojn *komparoj intertaksaj*. Ekz-e: *mi preferas silenti, ol diri*

*stultafojn; pli bona estas hodiaŭ pasero, ol morgaŭ ansero²; pli bone estas, ke la komitato faru tro malmulte, ol ke ĝi facilanime faru ian paŝon²; pli bone estas iri seninfana en la ĉielon, ol se ambaŭ, la patro kaj la infano, iras en la inferon². Kiel oni vidas, efektive, oni eldiras komparan takson pri du aferoj. Ĉi tie apartenas ankaŭ, kiel veraj malparaleletoj, la frazoj kun la konjunkcio-paro **ju pli... des malpli: ju pli vi petas lin, des malpli li cedas.***

7. **I d e n t i g o**, aŭ pli ĝuste malidentigo, estas esprimata per **alia, malsama** ol: *venis alia homo, ol (tiu) kiun mi atendis. Ĉe negacio, tio kompreneble signas identigon: mi vidis ne alian, ol lin mem.* Kiel oni vidas, ĉe negata malegaleco, oni uzas **ol**, analoge al tio, ke ĉe negata egaleco oni uzas **kiel**: *mi vidis tie ne la saman societon, kiel antaŭe.*

Rim. V. Zamenhof uzas ofte rilativojn post **ol** (ekz-e **ol kiel, ol kia, ol kiom**): *taksi iun pli alte, ol kiom li meritas; mi havas pli bonajn okulojn, ol kiel oni pensas.* Tiujn oni nun ĝenerale ellasas, ĉar la uzo de nura **ol** neniam estigas konfuzon. Tamen kiel estas necesa ĉe statadjekto: *li estas pli granda kiel poeto, ol kiel dramverkisto.* (Vd. § 200), kaj oni devas esprimi la rilativojn, kiam **ol** apartenas al la relativa prop-o mem: *kiu ordonis, ke vi diru tiajn vortojn, ol kiuj nenio povas esti malpli konvena?* ("Luno de Israel", pĝ. 162). Cetere tiaj konstruoj komplikaj estas prefere evitindaj.

Tiu uzo de rilativoj post **ol** montras, ke ili povus esti uzataj ankaŭ post la tute analogia kompara vorto **kiel** (**kiel kia, kiel kiom** ktp.). Se post **kiel** oni ĉiam elipsas ilin, ties kaŭzo estas eble nur la strebo je eŭfonio. Tamen, elipse ili povas esti subkomprenataj, kaj per tio fariĝas superflua la pedanta uzo de rilativoj antaŭ komparilo konsistanta el unu frazelemento (*li estas "kia" lia patro... tiajn filojn, "kial" vi... en la saman lernejon, "kien" vi ktp.*), anstataŭ la simpla **kiel** (plus subkomprenata: **kia** estas; **kial** estas; **kien** ktp.).

Rim. VI. Unu speco de disgradigaj komparoj estas ankaŭ preparolinda: temas pri la uzo de "ne pli ol" kun la senco de "same kiel... ne". Tiam uzon pravigas sole la fakto, ke ĝi enkondukas ironian, iel absurdan komparon, tiamaniere akcentitan per uzo de disgradiga esprimo, dum oni atendus samgradigan: *ne estas pli da mono en mia poŝo, ol da haroj sur kalva kapo; li ne estis pli markizo, ol mi papo; tiu dua letero ne estis pli respondita, ol la unua.* La ironiecon en la lastaj du ekzemploj oni tuj sentos, se nur oni konsideras, ke la nocioj esprimitaj en la komparo ne toleras ian gradigon: oni ne estas pli aŭ malpli markizo aŭ papo, oni estas tia aŭ tute ne; leteron oni ne respondas pli aŭ malpli, oni respondas ĝin aŭ ne. S-ro Nakamura prave atentigis, ke tiaj dirmanieroj estas konfuzaj aŭ eĉ nekompreneblaj por orientanoj, se la ironieco mankas: oni tiam devas turni la frazon alimaniere, ekz-e per "kaj same... ne..." aŭ "sed ne... kiel... ne". G.W.

II. Supozaj komparoj.

263

Ili komparas la ĉefprop-an agon al ago supozita. Ĉe la supozaj subprop-oj oni povas distingi *kazon teorian, kazon eblan kaj kazon fikтивan.* Tiuj tri kazoj troveblas ankaŭ tie ĉi.

1. *Kazo teoria.* Agon aŭ staton oni esprimas en formo de supozo kaj komparas ĝin al la ĉefprop-a enhavo tiel, ke oni *neas* la egalecon por montri pli grandan intenson. La ĉefprop-on oni enkondukas per **neniam**, krome oni ĉiam metas la demonstrativon tiel. La duobla subjunk-

cio estas kiel se. Modo: indikativo: *neniam oni estas tiel malfeliĉa, kiel se oni falis el la ĉielo de granda feliĉo*. La neegalecon oni povas esprimi ankaŭ per *pli... ol se*, sed per tio oni iom malfortigas la esprimon: *neniam oni eraras pli facile, ol se oni kredas sin senerara en ia afero*. (Vd. § 257, 2.).

Rim. I. Tiajn subprop-ojn oni povas transformi en simplajn supozajn (teoriajn) subprop-ojn, metante en la ĉefprop-o plej anstataŭ *neniam: plej malfeliĉa oni estas, se...; plej facile oni eraras, se...* Sed la efekto per tio malpliigas.

2. *Kazo ebla*. Agon okazantan per aŭ pri nedifinita persono aŭ objekto (iu aŭ io) oni esprimas en formo de supozo kaj komparas ĝin al la ĉefprop-a enhavo. Subjunkcio: kiel se. Modo: indikativo: *kiel se granda ŝtono iun batas, tia estis lia surprizo; li falis, kiel se iun trafis kuglo; li veis, kiel se al iu oni eltiras la dentojn; se li diras: mi volas tion fari, ĝi estas tio sama, kiel se iu el ni tion jam faris²*. (Vd. § 257, 3.).

Laŭ la interna strukturo, tiaj frazoj estas elipsaj konstruoj. Kiel se anstataŭas kiel estas se aŭ, pli ĝuste, inter kiel kaj se estas subkomprenata la ripetita ĉefprop-o rilatigita al iu: *kia estas ies surprizo, se granda ŝtono lin batas, tia estis...; li falis, kiel iu falas, se lin kuglo trafis*.

Rim. II. Kiel oni vidas el ĉi tiu analizo, tia konstruo estas miksitita el kazo teoria kaj kazo ebla (vd. supozaj subprop-oj, § 257), ĉar ĝi montras interdependon de du agoj kvazaŭ teorie, sed aliparte rilatigas ĝin al speciala, difinita ago aŭ stato.

Rim. III. Tiajn konstruojn oni uzas nur malofte. Plej ofte oni rilatigas la komparon ne abstrakte al iu, sed al la ĉefprop-a afero mem. Sed tiaokaze, ĉar la komparo enhavas neeban, fiktivan konstaton, oni havas komparon fiktivan.

3. *Kazo fiktiva*. La supozita ago, kiun oni komparas, estas neebla, fiktiva. Subjunkcio: kvazaŭ. Modo: kondicionalo. (Vd. § 257, 4.).

Fiktiva estas la supozita komparo, se ĝi esprimas troigon, neebajn, aŭ ion evidente ne-faktan: *li staris konsternite, kvazaŭ la ĉielo estus falinta sur lin; la patro frapis sur la pordo, kvazaŭ li estus fremdulo²; ili amis sin reciproke, kvazaŭ ili estus fratoj²; ili levis unu manon supren, kvazaŭ ili ion tenus²; la ĉielo aspektis, kvazaŭ ĝi estus balaita²; tiu manuskripto estis kunvolvita tiamaniere, kvazaŭ ĝi estus tuj fordonota al iu²; ŝi iris tiamaniere, kvazaŭ ŝi ne sciis, kien ŝi iras²*.

Z. ne uzis unuece kondicionalon post kvazaŭ: *de li eliras tiaodoro, kvazaŭ li ĵus eliris el brandfarejo; ili faras mienojn kvazaŭ ili laboras*. Laŭ la Z-a lingvouzo do la modo post kvazaŭ ŝajnas nedecidita demando. Li ja uzis en tute analogaj frazoj jen indikativon, jen kondicionalon. Komparu: *ŝi kuiris renkonte al li, kvazaŭ ŝi volus lin kisi*; kaj: *li vokas vin, kvazaŭ li volas ion komuniki nur al vi sola*. Tia hibrida uzo aperas eĉ en la sama frazo: *lin la popolo nomas reĝo, kvazaŭ la mondo nun denove komenciĝus kaj kvazaŭ malaperis nun subite la historio kaj la tradicioj²*.

Nu, la gramatika logiko pledas nekontesteble por kondicionalo post kvazaŭ.

Nome, la suprajn frazojn oni povas esprimi ankaŭ en la formo de ebla komparo: *la patro frapis kiel fremdulo (frapas); ili amas sin reciproke*

kiel fratoj (sin amas). Kio estas la diferenco inter la du okazoj?

Nu, en la komparoj enkondukitaj per kiel oni komparas la agon aŭ staton de la ĉefprop-a elemento al la ago aŭ stato de *alia* elemento. Tia komparo estas ebla. *Li tremas, kiel aŭtuna folio* (tremas) – tie ĉi oni komparas la tremon de homo al tiu de folio, kaj la tremoj ja povas similaj inter si.

Male, en la komparoj enkondukitaj per kvazaŭ oni *identigas* la komparatan elementon kun alia elemento: *patron* kun *fremdulo*, *nefratojn* kun *fratoj*. Tia identiga komparo do estas evidenta neeblaĵo, ĝi povas okazi nur en la formo de fiktiva (kondicionala) supozo: *li tremas, kvazaŭ li estus aŭtuna folio* – ĉi tie oni identigas homon kun folio; evidenta neeblaĵo, se oni tion faras *indikative*.

En la kvazaŭ-komparoj do oni ĉiam subkomprenas supozan subprop-on, kiu fiktive supozas la identecon: *la patro frapis, kiel* (li frapus) *se li estus fremdulo; ili amas sin reciproke, kiel* (ili sin amus) *se ili estus fratoj*. Do la strukturo de kvazaŭ estas: kiel (kia) plus subkomprenata prop-o en kondicionalo plus se. Ĉar do la kvazaŭ-propozicio estas propre supozata subprop-o de kondicionala ĉefprop-o, ĝi evidente postulas predikaton kondicionalan. La suprajn Z-ajn ekzemplojn do pli ĝuste estus formi jene: *de li eliras tia odoro, kvazaŭ* (kia elirus, se) *li estus ĵus elirinta el brandfarejo; ili faras mienojn, kvazaŭ* (kiajn ili farus, se) *ili laborus*.

Kelkaj opinias, ke post kvazaŭ oni povus tamen uzi indikativon, se oni esprimas komparon inter la nuna kaj alitempa stato de iu: "*li ŝanceliĝas, kvazaŭ li estas ebria*" laŭ ili signifus, ke li ŝanceliĝas, kiel tiam, kiam li estas ebria. Nu, tiaokaze ja temas ne pri supozo, sed pri indika komparo, kaj anstataŭ kvazaŭ oni devas uzi kiel se (= kiel kiam). (Vd. § 262, I. A. 1.).

Aliaj, kvankam rekonante la logikan neceson de kondicionalo, tamen rigardas ĝin superflua, ĉar, laŭ ili, kvazaŭ jam entenas en si la kondicionalon, do oni ne bezonas ĝin signi aparte. Tiun opinion tamen refutas: a) la analogio de por ke, ĉar ĉi tiu same entenas la volitivecon, tamen post ĝi ĉiu uzas u-modon; b) la propra senco de la indikativo, kiu ja ne estas io senkolora, sur kiu kvazaŭ povas aperigi sian koloron de fiktiveco, sed havas tre difinitan koloron, tiun de la *fakteco*, kiu akre kontrastas en Esp-o kun la fiktiveco – kaj ĝuste la kolizion de tiuj du kontrastoj oni sentas malagrable ĉe la indikativo post la subjunkcia kvazaŭ. Tiun teorion cetere prezentas homoj, en kies nacia lingvo la "konjunktivo" iom post iom malaperis kaj la indikativo fariĝis la ĝenerala modo.

Oni povas do eldiri la regulon: Per la kompara kvazaŭ oni esprimas identecon de ĉefprop-a elemento kun la subprop-a, en formo de komparo. La modo estas ĉiam kondicionalo.

Rim. IV. Zamenhof, en la unuaj jaroj de la lingvo, uzis kelkfoje kiel se kun kondicionalo: *ĝi estos al vi, kiel se akra glavo vin tranĉus*. Tion klarigas, ke en tiu tempo

ankoraŭ ne ekzistis la vorto *kvazaŭ*: ĝi do konsistigas neimitindan arkaismon. Oni rezervu kiel se por la kazoj realaj kaj eblaj (vd. supre) kaj uzu ĉiam *kvazaŭ* en kazoj fikтивaj. Do: *ĝi estos al vi, kvazaŭ akra glavo vin tranĉus; ĝi estos al vi, kiel se akra glavo iun tranĉas*. (En la unua okazo *kvazaŭ*, ĉar ambaŭ frazoj rilatas al *vi*, do ekzistas fiktiva identigo; tial oni uzas kondicionalon. En la dua okazo *kiel se*, ĉar la subprop-o rilatas al *iu*, do la komparo estas ebla; tial oni uzas indikativon.)

Post *kvazaŭ* ofte staras sola frazelemento; tiun oni povas rigardi kiel parton de kompletigebla elipsa frazo, tiel same, kiel post la ago-kompara kiel (vd. § 262): *li venis kvazaŭ reĝo* (venus); *oni akceptis lin kvazaŭ* (oni akceptus) *reĝon*. El tio sekvas, ke post la subjunkcia *kvazaŭ* la frazelemento devas havi ĉiam la saman kazon, kiel ĝia rilatato (nominativon, akuzativon, prepozitivon): *li timigis lin kvazaŭ fantomo*; *li timiĝis de li, kvazaŭ de fantomo*. Kp. tamen sube Rim. VI.

Ĉar *kiel* povas esprimi ankaŭ veran identecon, dum *kvazaŭ* montras ĉiam identecon fikтивan (similecon), *kvazaŭ* estas tre bone uzebla por nepriki la komparan sencon de la elipsa prop-o. Tamen, oni ne uzu *kvazaŭ* (pro ĝia plipezeco):

se la prop-o ne estas elipsa (tiam la kompara senco estas evidenta ankaŭ kun kiel);

se en la elipsa prop-o troviĝas ankaŭ komplemento krom la subjekto (el la sama kaŭzo): *li amis lin, kiel patro sian filon; ŝi zorgis pri ŝi kiel patrino pri filino*.

Rim. V. Ĉe subjekt-sameco oni povas uzi ankaŭ partcipan konstruon: *la hundoj ekbojis, kvazaŭ ekvidinte urson²; ili paroladeti, kvazaŭ dezirante moki iun alian²*. Tiaokaze la fiktivecon montras nur *kvazaŭ* per la kondicionalo, kiun ĝi postulas post si en la elipsita prop-o: *la hundoj ekbojis, kiel ili ekbojus ekvidinte urson*. Tio estas tute analoga al la indikativa partcipio anstataŭ fiktiva se (vd. § 258, I. ĉe la fino).

Rim. VI. *Kvazaŭ* povas esti ankaŭ adverbo (kvazaŭe). Tiaokaze ĝi ne influas la modon de la predikato. Tian adverbajn *kvazaŭ* oni povas rekonii per tio, ke ĝi estas en ĉefprop-o, aŭ, se ĝi estas en subprop-o, tie troviĝas alia subjunkcio: *ŝiaj okuloj kvazaŭ paroladis²; ili vidas en mi personon, kiu kvazaŭ ludas la rolon de reĝo²; mi vidis, ke li kvazaŭ frenezas pro la ĝojo*.

El tiu ĉi duflanka uzebleco de *kvazaŭ* sekvas, ke la objektan predikativon oni povas meti post ĝi:

a) en akuzativon; tiaokaze oni rigardas ĝin subjunkcio, kaj la strukturo de la elipsa prop-o estas analoga al kiel-prop-o: *oni rigardis lin kvazaŭ* (oni rigardus) *reĝon*.

b) en nominativon; tiaokaze oni rigardas ĝin adverbo (*kvazaŭe*), kiu ne sekvigas elipsan prop-on, sed simple modifas la sencon de la rekta predikativo: *oni rigardis lin kvazaŭ reĝo* (kp. *oni rigardis lin preskaŭ reĝo*). Tamen ĉar tio povas esti ĝi miskomprenon, plej bone estas ĝin eviti. Z. uzis tiaokaze la adjektivan formon: *kvazaŭa reĝo*.

Ne malofte, ĉar nekonfuzible, oni uzas tian adverbajn *kvazaŭ* ĉe adjektivaj predikativo: *oni rigardis lin kvazaŭ perdita* (Kp. *oni rigardis lin kiel perdita*); *rigardu ĝiajn fruktojn kvazaŭ konsekritaj²*.

Subpropozicioj instrument-indikaj

264

Ili havas la funkcion de ĉefprop-a instrument-adjekto. Demonstrativoj: **per tio, dank'al tio, helpe de tio, pere de tio (tiu)**. Ili povas esti:

1. *Eksplikaj*. Subjunkcio: **ke**: *li multe helpis min per tio, ke li lerte asistis; li sukcesis nur dank'al tio, ke la cirkonstancoj lin favoris.*

2. *Rilataj*. Subjunkcioj: rilatpronomoj: *li defendis lin per tio, kio trafis en lian manon; li faris la laboron helpe de tiu, kiun mi rekomendis al li.*

La demonstrativojn oni devas konservi. Eventuale oni povus ilin ellasi, se la demonstrativo havas la saman prepozicion, kiun la rilativo: **per tiu – per kiu** ktp.: *ili faris la negocon pere de kiu ni faris la nian; li prosperis dank'al kio lia frato: per granda diligento kaj ŝparemo.* Sed tia koncizeco kuntrenas ian ĝenon por la leganto, kaj estas ne konsilinda en la ordinara prozo; des pli konstruoj, kiel: *sendu la leteron per kiu venos por ĝin forporti; li defendis sin per kio trafis en lian manon – estas nekorektaj.*

Rim. Anstataŭ **per tio** ke kelkfoje oni povas uzi **kiam** en antaŭmetitaj subpropozicioj, se **kiam** anoncas ion, kio estos eksplike klarigata en posta propozicio: *kiam li diris: "ekkonu vin mem", li diris: ekkoni vian animon (per tio, ke li diris...); kiam li nomis lin patro, li volis esprimi al li sian amon kaj sindonon (per tio, ke li nomis...).* Oni trovas ankaŭ **el tio** ke: *el tio, ke mi detranĉis la anguleton de via vesto, sed mi ne mortigis vin, sciu kaj vidu, ke mi ne havas malbonon nek krimon en mia mano².*

Subpropozicioj konsekvens-indikaj

265

Ili esprimas la manieron de la ĉefprop-a ago per ĝia konsekvenco. Subjunkcio: **ke**. Demonstrativoj en la ĉefprop-o: **tiel, tiom, tia**.

Ekzemploj: *la nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi²; tiel li ektimis, ke li komencis kuri; tiom li malfortiĝis, ke eĉ sian manon li ne povis levi; tia bruo estis en la salono, ke oni tute ne povis aŭdi la oratoron.*

Ofte la demonstrativo staras je la fino de l' ĉefprop-o kaj kvazaŭ transiras en la subprop-on: *ege li hontis pri la afero, tiel ke li ne kuraĝis eĉ eliri sur la straton.*

Kelkfoje oni ellasas la ĉefprop-an demonstrativon: *la muroj estis ornamitaj per grandaj pentraĵoj, ke estis plezuro tion ĉion vidi²; li kriegis, ke li tute raŭkiĝis.*

266

La *modo* en la konsekvens-prop-oj povas esti:

1. **I n d i k a t i v o**, se la konsekvenco de la ĉefprop-a ago estas fakta (vd. la suprajn ekzemplojn).

2. **V o l i t i v o**, se la ĉefprop-o esprimas volon, intencon, ordonon por ago, kiu, se ĝi okazos, estigos la subprop-an agon aŭ staton: *mi volas tiel aranĝi la aferon, ke ĉiuj estu kontentaj; vi devas vin tiel alkroĉi, ke vi ne falu; portu la pakafon tiel, ke nenio elfalu; parolu tiel, ke oni vin komprenu.*

3. Kondicionalo,

a) se en la ĉefprop-o oni esprimas neegalan komparon: tiaokaze la subprop-on enkondukas ol ke: *li estas multe pli forta, ol ke vi povus lin venki; li havas alian sintenon, ol ke oni povus kun li simpatii.*

Rim. I. La sama konstruo povus esti uzata ankaŭ post ĉefpredikata tro: *tiaj instrukcioj estis tro konfuzaj, ol ke mi povus min konfidi al ili.* Sed tiaokaze oni ĝenerale, kvankam nelogike, uzas por ke (vd. § 268).

b) se en la ĉefprop-o estas neata tiu ago, kiu, se ĝi okazus, kunportus la subprop-an agon aŭ staton: *li ne estas tiel lerta, ke li povus tion fari; li ne parolis tiel laŭte, ke oni estus povinta lin kompreni; nenia devo estas por mi tiel sankta, ke mi ne estus preta ĝin rompi, se la afero concernas mian vivon².* Sed ĉe Z. oni trovas ankaŭ volitivon tiaokaze: *E-o ne estas ankoraŭ en tia feliĉa stato, ke oni povu tiri el ĝi profiton.* Ĝi ŝajnas malpli konsilinda.

Rim. II. La sama konstruo kun la sama senco estas uzebla ankaŭ sen la demonstrativo tiel: *Dio ne estas homo, ke li mensogus, kaj ne homido, ke li pentus²; li ne kriis por helpo, ke oni estus povinta lin savi; besto ne parolas, ke oni sciuss, kio al ĝi doloras; vi ne faris senerare vian taskon, ke vi povus pretendi rekompencon; li ne havas ŝparitan monon, ke li povus vivi senzorge* (Kp. Li ne havas tiom da ŝparita mono, ke li povus...).

c) en pluraj lingvoj ekzistas frazkonstruo por insiste esprimi, ke la ĉefprop-a ago konkludigas la neeblecon de la subprop-a ago aŭ stato (A. *far from*; F. *loin de*; G. *weit entfernt davon...*, *geschweige denn...*; I. *ben lungi da*; Lat. *nedum*; Pola *coz dopiero*). En Esperanto oni povas uzi en tiaj prop-oj ne nur ne... sed eĉ (vd. § 223 ĉe-fine). En tiaj prop-oj "protestaj" la emfazon oni povas ankoraŭ pliigi per kiel do... dum kaj kondicionalo: *kiel do li estus fininta la laboron, dum li apenaŭ ĝin komencis?* Ce inversa vicordo de la prop-oj, dum estas superflua: *mi eĉ ne vidis lin unu fojon, kiel do li estus mia amiko?*; *ĉio mortema pereas, kiel do restus eterna la honoro de la parolo?*

Cetere, oni eble povus helpi sin ankaŭ per male ke, kvankam tia dirmaniero estas ĝis nun neuzata: *male ke li estus riĉulo, li ne havas unu groŝon!*

Rim. III. Proksimume la saman sencon esprimas ankaŭ des malpli kun indikativo: *li eĉ ne komencis la laboron, des malpli li ĝin finis.* Kp. § 225.

B. — SUBPROPOZICIOJ KAŬZAJ

La kaŭzaj subprop-oj havas la saman funkcion, kiel la ĉefprop-a kaŭzadjekto. Ilia speciala subjunkcio estas ĉar: *mi ne povas tien iri, ĉar mi estas malsana* (pro mia malsaneco); *la infano ploras, ĉar iu lin batis* (pro ies batado al li). La respondaj demonstrativoj en la ĉefprop-o estas tial, pro tio, sed ilin oni plejofte ellasas, kaj uzas nur por insisti pri la kaŭzeco: *la bonon mi faris nur tial, ĉar mi ne povis agi alie².*

Kiam unu el tiuj demonstrativoj staras ĝuste antaŭ la subjunkcio, oni

plejofte uzas tiam ke anstataŭ ĉar: *se Volapük akiris certan nombron de adeptoj, tio okazis nur tial, ke la ideo de la lingvo tutmonda estas alta kaj alloga^z; pro tio, ke vi ne obeis la voĉon de la Eternulo, mortigos vin leono^z.*

Rim. I. Anstataŭ pro tio, ke oni povus, analoge al por ke, uzi ankaŭ pro ke: *vi fiaskis, pro ke vi ne obeis mian konsilon.* Tio tamen restis nekutima ĝis nun.

La subprop-o kun ĉar estas ofte antaŭmetita. En tia okazo, Zamenhof kutimas enkonduki la ĉefprop-on per tial: *ĉar la aŭtoro de Esp-o tuj en la komenco rifuzis... ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esp-o estas nenies propraĵo^z.* Sed tio ne estas deviga: *ĉar la vivo sen amikoj estas plena de insido kaj timo, la racio mem nin admonas ligi amikecojn.*

Rim. II. La kaŭzo de tiu kutimo de Zamenhof estas la bezono pri klareco. Efektive ĉar povas ankaŭ, en tia pozicio, funkcii kiel konjunkcio kaj enkonduki ĉefprop-on: *ŝi diris al la knabino: "Vi estas... tiel honesta, ke mi devas fari al vi donaĉon"; ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino^z.* Kiel oni vidas, en tia okazo la konjunkcio ĉar alportas la klarigon de la antaŭa frazo, dum la subjunkcio ĉar alportus la klarigon de la sekvanta ĉefprop-o: *ĉar ŝi estis feino, ŝi kapablis fari miraklojn.* Por eviti tian momentan konfuzon pri la ĝusta valoro de la prop-o kun ĉar, oni disponas jenajn rimedojn:

1. Uzi la antaŭmetitan subprop-on kun ĉar nur komence de alineo: *ĉar pri la esenco de la esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni... trovis necesan... doni la sekvantan klarigon^z* (Vidu ankaŭ la sekvantajn alineojn de tiu Buloŝa Deklaracio).
2. Antaŭmeti al ĉar alian konjunkcion: kaj ĉar, sed ĉar, aŭ adverbon: cetero ĉar ktp.
3. Anstataŭigi ĉar per tial ke aŭ pro tio, ke.

Rim. III. Eĉ, kiam ĝi estas postmetita, ĉar povas enkonduki ankaŭ prop-on kunorditan-klarigan, do ĝi funkcias ankaŭ kiel konjunkcio: *la kuracisto venis malfrue, ĉar la malsanulo jam mortis; mi estas senlime danko al vi, ĉar mi vere ne estus sciinta kion fari sen via helpo.* Tiajn frazojn oni povas distingi de la kaŭzadjektaj per tio, ke la ĉar-propozicio ne estas transformebla en kaŭzadjekton kaj ĉar estas anstataŭigebla per nome. Vd. § 225. Oni proponis por tiaj okazoj specialan konjunkcion (nam), sed ĝi ne enradikiĝis.

La modo en la subprop-oj kaŭzadjektaj estas indikativo, eĉ en la okazoj, kiam oni neas la kaŭzon: *la vortoj "ĝardenon", "tablon" staras tie ĉi en akuzativo, ne ĉar la prepozicioj tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton^z.* Sed: *mi faris tion ĉi, ne ĉar mi envidus liajn laŭrojn^z,* por akcenti la nerealecon de la kaŭzo.

Post ĉar oni trovas kelkfoje prop-on elipsan, kun la ellaso de ĝi estas: *tiu knabino, ĉar tre ĉarma, estas amata de ĉiuj.* Tio eblas nur ĉe subjekt-sameco, krome: la elipsa subprop-o devas senpere sekvi la ĉefprop-an subjekton.

Participa konstruo: ĉe subjekt-sameco la predikaton de la kaŭza subprop-o oni povas transformi en e-finajan participon: *perdinte sian tutan havaĵon, li mortigis sin* (ĉar li perdis); *sciante pri la danĝero, mi gardos min* (ĉar mi scias).

Rim. IV. Kelkfoje tute mankas la subjunkcio, kaj la kaŭzecon montras nur la demonstrativo en la ĉefprop-o: *hodiaŭ estas bela frosta vetero, tial mi prenas miajn glitilojn*². Sed tiajn prop-ojn oni jam devas rigardi ĉefprop-oj, kaj la duan prop-on kunordita-konkluda (§ 224).

Rim. V. Post la ĉefprop-aj verboj *ĝoji, miri, koleri, gratuli, laŭdi, indigni, akuzi, senti doloron*, ks. oni uzas simplan **ke**, ĉar la subprop-ojn oni rigardas nerekt-objektaj (**pri tio ke**): *mi gratulas vin, ke vi sukcesis; mi miras, ke li ne venis; mi laŭdas vin, ke vi bone kondukis; li indignis, ke oni ne akceptis lin afable* (Vd. § 235).

Same, oni uzas **ke**, kiam, en rekta parolo, la subprop-o esprimas ne tiom la kaŭzon de la ĉefprop-a ago aŭ stato, kiom la kaŭzon de la parolo de l' rekta parolanto. Tion oni povas nomi *motivanta ke*: *kia malsaĝulo mi estis, ke mi volis reiri en la kaĝon!*² (malsaĝulo mi min nomas, ĉar mi volis...); *estu malbenitaj, ke vi portas oron kaj arĝenton, vi riĉaj!*²; *kio estas al la popolo, ke ĝi ploras?*² (mi demandas tion, ĉar...).

Rim. VI. Oni uzas **se**, kiam la subprop-o esprimas la kaŭzon, motivon de la supozo, kiun esprimas la ĉefprop-o. Tia **se** do anstataŭas: *tion mi supozas, ĉar...* Oni povas ĝin nomi *motivanta se*: *la satano sendube konas siajn homojn, se (tion mi supozas, ĉar) li prenis vin kiel makleriston*²; *eble ankoraŭ atendas min ia ĝojo, se mi tiel mirakle konserviĝis*². Oni povas uzi ankaŭ **ke** tiaokaze.

Speciala kazo estas la demand-motivanta **se**. Tian oni uzas en kaŭzaj subprop-oj, kies ĉefprop-o havas negacian sencon, sed la negacio estas esprimita per demanda formo kaj kondicionalo: *kiel vi povus labori ĝis malfrua nokto, se jam nun vi estas dormema?* (vi ne povos labori... ĉar jam nun vi estas...); *kial la homo sukcesas en tio, kion li havas de la formiko, se li malsukcesas en tio, kion li havas de la dioj?*² Oni povas uzi ankaŭ **ĉu** tiaokaze.

C. — SUBPROPOZICIOJ CELAJ

La celaj subprop-oj havas la funkcion de ĉefprop-a cel-adjekto. Ili estas enkondukataj per **por ke**, kiu estas mallongigo de **por tio ke**; la *modo* estas volitivo: *ili faris ĉion eblan, por ke li sentu sin hejme en ilia domo; ni devas esti tre singardaj, por ke, anstataŭ akceli la aferon, ni ĝin ne pereigu por ĉiam*².

Por tio ke povas esti uzata, se oni volas insisti pri la celeco: *mi venis por tio, ke ni fine aranĝu la aferon; mi donis al li la monon ne por tio, ke li ĝin fordiboĉu, sed ke li aĉetu necesajojn; ne por tio li laboris, ke nenian pagon oni donu al li*.

Kelkfoje oni forlasas eĉ **por**: *ekzistas ezoko, ke fiŝetoj ne dormu*²; *trapiku lin, ke li momente falu*²; *kiu mi estas, ke mi iru al la faraono?*² Kp. ankaŭ § 242.

Se la subjekto de la ĉefprop-o kaj subprop-o estas identa, oni plej ofte uzas infinitivan konstruon kun **por**:

mi venis por diri al vi...; li iris en la dormoĉambbron por enlitiĝi; mi diras tion ne por vin timigi, sed por averti pri la danĝero; li estis invitita por kanti.

Se la subjektoj de l' du prop-oj ne estas identaj, tia konstruo ĝenerale estas nekorekta. Tamen oni trovas esceptojn:

1. En la esprimoj: *por tiel diri, por paroli sincere, por ne paroli pri tio: li estas, por tiel diri, sia propra malamiko; por paroli sincere, via argumento estas absurda.*

2. Post ĉefpredikatoj: *estas (ekzistas), troviĝas, restas, mankas, servas: ne estis akvo por la popolo por trinki^z; en la ŝranko ja troviĝas io por manĝi; mankas ĉio por fari la aferon; restas nenio por fari.*

Tian konstruon oni povas nomi *por absoluta*.

Rim. I. La absoluta **por** ĉe la okazoj sub punkto 1. kelkfoje povas estigi miskomprenon: *mi ne volas tien iri, por paroli sincere* (oni komprenos: *por ke mi parolu tie sincere*). Fakte, **por** tie ĉi ne estas uzata proprasence; ĉi tie temas ja ne pri celeco, sed plie pri kondiĉo. Tial Z. uzis kelkfoje se en tiaj okazoj: *la foso, se preni la plej malmulte, havis almenaŭ 8 futojn da larĝeco^z; se lin kompari kun la nuna reĝo, li estis Apolono ĉe Satiro^z*. Tio apenaŭ estis imitata, kvankam ĝi meritus esti uzata ĝenerale en tiaj okazoj, anst. la absolutaj **por** kaj la absolutaj participoj: *se tiel diri; se paroli sincere; se ne paroli pri...; se konsideri, ke...; se ne konsideri, ke* (anst. [ne] *konsiderante, ke*). Tion oni povas nomi *absoluta se*.

El objekta subprop-o enkondukita per **kio** estas **por** oni ellasas **kio estas** post ĉefpredikato *havi*: *mi havas nenion (kio estas) por manĝi; li havas multe por fari; oni ne havas ĉambron por lui; mi havas ion por diri.*

Cetere, se la ĉefprop-a kaj subprop-a subjektoj estas malsamaj, oni uzas simplan infinitivon sen **por**: *oni vokas la bovon ne festeni sed treni^z; doni manĝi kaj trinki^z; li sendis ŝin promeni*. Vd. § 186.

La *modo* en la celprop-oj, kiel ni diris, estas *volitivo*. Tia ĝi estas ankaŭ tiam, kiam la ĉefprop-o estas negacia: *li nenion faris, por ke li sukcesu; multe mankis, por ke li estu sukcesinta*. Tamen, oni uzas kelkfoje ankaŭ aliajn modojn post **por**:

1. *Indikativon*, se la subprop-o indikas la jam atingitan celon de la ĉefprop-a ago: *multe li klopodis por tio, ke li fine sukcesis; sola mispaŝo sufiĉis por tio, ke li nun havas nenan reputacion; tio sufiĉas por tio, ke ili plu ne povas teni la okulojn nefermitaj^z*.

Rim. II. Tia konstruo estas analoga al la indikativo post *ebligi* kaj *ne malhelpi* (vd. § 231). Tamen ĝi estas pli permesebla, ĉar la prepozicio **por** iom malfortigas la dependecon inter la ĉefpredikato kaj **tio**, kaj tiamaniere la enhavo de **tio** estas eksplikebla per *ke*-prepozicio kvazaŭ sendepende de la ĉefprop-a predikato. Cetere, en tiaj kazoj oni devas uzi ĉiam la plenan formon **por tio ke**.

2. *Kondicionalon* oni povas uzi

a) se la ĉefprop-o de la celprop-o estas siavice subprop-o kondicionala: *bone estus, se li jam venus, ke ni povus aranĝi la aferon*. Oni uzas simplan **ke**, sen **por**.

b) se en la ĉefprop-o staras **tro** antaŭ la predikato aŭ predikativo: *la ideo estas tro altiranta, por ke la homoj rifuziĝus je ĝi^z; ŝi tro amas sian infanon, por ke ŝi povus ĝin ĝuste eduki*. Sed oni povas uzi ankaŭ *volitivan*: *la besto estas tro sovaĝa, por ke oni povu ĝin dresi*. Tia estas cetere la plej ofta okazo ĉe Zamenhof: *mi estas tro sankta, por ke mi floru^z; mi*

tro multe vin respektas..., por ke mi faru ion similan²; ĝi estas tro kaduka, por ke oni povu lasi ĝin stari².

(Sed post *sufiĉe*, kiu ja indikas efektivecon, oni ĉiam uzu volitivon: *la bolido sufiĉe proksimiĝis al la tero, por ke oni ĝin mezuru*).

Ĉe subjektsameco eblas ankaŭ infinitiva konstruo: *tio estas tro bela por esti vera; viaj okuloj estas tro puraj, por vidi malbonon².*

Rim. III. Tiaj prop-oj estas propre konsekvencc-indikaj, tial oni povas ilin enkonduki ankaŭ per *ol ke* (Vd. § 266).

C. VERBOTEMPOJ EN SUBPROPOZICIOJ

269

La verbotempoj de la diversaj subprop-oj kondutas dumaniere rilate al la ĉefprop-a tempo. Ili povas esti:

1. *relativaj*, t.e. rilatigitaj al la ĉefprop-a tempo: la prezenco respondas al la sama tempo de l' ĉefpredikato, la preterito signas antaŭtempecon, la futuro posttempecon rilate al ĝi. Ekzemple:

mi vidis, ke li falas. (Tiam.)

mi vidis, ke li falis. (Antaŭe.)

mi vidis, ke li falos. (Tuj poste.)

En tiaj subprop-oj do la verbotempo ne havas fiksitajn rilatojn al la efektiva nuntempo; tiu rilato evidentiĝas nur el la kunteksto. Ekzemple: *li sciigis min, ke li venos morgaŭ* –

ĉi tie *venos* estas posttempa al la efektiva nuntempo. Male:

malfrue vi sciigis min, ke vi venos, do mi ne povis vin akcepti ĉe la stacidomo –

ĉi tie *venos* estas antaŭtempa al la efektiva nuntempo.

2. *absolutaj*, t.e. signantaj la tempon sen rilato al la ĉefprop-a tempo: la prezenco respondas al la efektiva nuntempo kaj sendepende de la ĉefprop-a tempo. Ekzemple:

mi iros tien, de kie vi venis –

ĉi tie la ĉefprop-o signas efektivan futuron (posttempecon), la subprop-o efektivan preteriton (antaŭtempecon) rilate al la efektiva nuntempo.

Tiaj prop-oj do ne havas fiksitajn rilatojn al la ĉefprop-a tempo. Ĝenerale, tamen, subprop-a predikato havanta la saman tempoformon, kiun la ĉefprop-a predikato, signas ankaŭ la saman tempon. Ekzemple: *li kuris, kiel li povis*.

Antaŭtempecon aŭ posttempecon oni esprimas, se tio estas necesa, per specialaj rimedoj.

La diferencon inter la du kazoj lumigu la jena ekzemplo:

kiam mi venis en la ĉambron, mi vidis, ke li skribas –

ĉi tie *venis* estas tempo absoluta apud la ĉefpredikato *vidis*, do per sia preterito ĝi signas la saman preteriton; *skribas* estas tempo relativa apud la ĉefpredikato *vidis*, do per sia prezenco ĝi signas ties tempon preteritan.

Tempoj relativaj

270

Relativa estas la subprop-a tempo:

1. En la subjektaj, objektaj, predikativaj, epitetaj subprop-oj *eksplikaj* (subjunkcio ke): *ŝajnis, ke pluvos; oni diros, ke vi estis mallerta; li havis la opinion, ke ĉio prosperos; mia decido estis, ke mi ne iros tien.*

Rim. Esceptoj estas tri:

1) se la ĉefprop-a verbo estas *okazi* aŭ *eventi*, ĉar tiam la ĉefprop-a verbo ne havas propran sencon, sed servas nur kiel atentigilo: *okazis poste, ke mortis Nahaŝ²; post tio okazis, ke David venkobatis la Filiŝtojn²; neniam okazos, ke ili fariĝos bonaj amikoj.*

2) se ekzistas ia interrilato de kaŭzo inter la du prop-oj: *lia facilanimeco kaŭzis, ke li bankrotis* (li bankrotis, ĉar li estis facilanima); *tio rezultigos, ke ĉio estos fuŝita; rapidigis iliajn paŝojn, ke la nokto jam estis alvenonta.*

3) se la ĉefprop-o esprimas taksan opinion pri la fakto esprimita en la subprop-o: *estis bona ŝanco, ke ne pluvus; estis utile, ke vi iom mensogis.* Kun la futuro, oni kutime uzas se anstataŭ ke: *estos bone, se vi ĉeestos.*

2. En ĉiuj dependaj demandoj: *estis dube, kiam li venos; mi ne sciis, kiu alportos la leteron; la demando estis, ĉu li helpos.*

3. En la **pri-, je-, al-, de-, el-, kun-prop-oj eksplikaj** (subjunkcio: ke): *oni vin akuzos, ke vi lin trompis; mi ĝojis, ke vi venos; mi kalkulis je tio, ke vi min helpos; ĉiuj aklamis al tio, ke li mem aranĝos la aferon; ĉion li atendis de tio, ke la sorto lin favoros; li venis kun tio, ke ĉio estas perdita.*

4. Post **por ke**: *mi iris tien, por ke ni renkontiĝu.*

En la subprop-oj kun relativa tempo jam la simplaj verboformoj esprimas antaŭ-, post- aŭ samtempecon, do ne estas necese signi tiujn per aliaj rimedoj.

Tempoj absolutaj

271

Absolutaj estas la tempoj:

1. En ĉiuj subprop-oj *rilataj* (subjunkcioj: rilatpronomoj): *mi ne vidis tiun, kiu venis.*

En tiu ĉi frazo la samtempecon la subprop-o esprimas per la sama tempo, kiun havas la ĉefprop-o.

Tio estas unu el la diferencoj inter rilataj subprop-oj kaj dependaj demandoj. En ĉi lastaj la samtempecon esprimas prezenco: *mi ne vidis, kiu venas.*

Rim. I. Post percept-verboj la subprop-oj enkondukitaj per kiel povas esti rigardataj kiel subprop-oj manieraj, sed ankaŭ kiel eksplikaj subprop-oj. Laŭ tio, oni do povas uzi en ili tempojn relativajn aŭ absolutajn preskaŭ laŭplaĉe: *mi vidis, kiel li kuris; mi aŭdis, kiel bruas la plandoj de l' marŝantaj soldatoj.* La lasta formo estas pli vigl-efekta.

Male, post sciig-verboj, la tempoj de la subprop-o estas ĉiam relativaj: *li rakontis, kiel li procedos.*

Ĉar la simplaj verboformoj signas ĝenerale samtempecon kun la ĉefpre-

dikata tempo, la antaŭ- aŭ posttempecon oni devas esprimi per aliaj rimedoj. Tiaj estas ekzemple la kompleksaj verboformoj: *mi estis sciinta, kion vi rakontis; li kontrolas, kion vi estos farinta*.

Laŭ la ekzemplo de la plej bonaj stilistoj, la kompleksaj verboformoj estas laŭeble evitindaj. Oni povas diri, ke unu el la markoj de bona stilo estas ilia ne-uzo. La principo reganta ĉi-rilate estas, ke oni ne uzu ilin pro nura konjugacia precizemo, sed nur en la okazo de efektiva neceso.

Pli elegante ol per la kompleksaj verbotempoj, oni esprimas la antaŭ-kaj posttempecon per *poste* kaj *antaŭe* en la ĉefprop-o: *la leteron, kiun mi sendos en tiu ĉi afero, mi montras antaŭe al vi; la respondon, kiun mi donis al vi, mi priparolis poste kun mia amiko, kaj tiu ĝin aprobis*. Tio estas eĉ la sole ebla maniero ĉe la verboj de daŭro sen rezulto: *lian nomon, kiu antaŭe estis famekonata, tiutempe jam neniu memoris*.*

Nenesaj estas la kompleksaj verboformoj:

a) Se la tempojn precize fiksas dato aŭ tempa adverbo (*morgaŭ, hieraŭ, hodiaŭ, ĵus, baldaŭ, antaŭ (ne)longe, post (ne)longe, jam, ankoraŭ, iam*): *alvenis la servisto, kiun hieraŭ vi dungis; morgaŭ mi sendos al vi ĉion, kion hodiaŭ mi skribos; mi jam aŭdis ofte, kion vi rakontis; mortis N. N., kiu iam estis prezidanto de nia grupo*.

b) Se unu ago logike necesigas la antaŭecon aŭ postecon de la alia ago. Tion oni povas nomi *logika tempo-sekvo*. Tiaj verboparoj estas ekzemple: *mendi aŭ sendi kaj ricevi; peti aŭ postuli, aŭ proponi kaj rifuzi aŭ akcepti; aspiri kaj atingi; morti kaj enterigi; demandi kaj respondi*. Ekzemple: *mi ne ricevis la libron, kiun mi mendis; li certe rifuzos, kion vi proponos al li; la viktimojn, kiuj mortis ĉe la akcidento, oni enterigis kun granda funebra soleno; ĉu vi respondos sincere, kion mi demandas?; li neniigis ĉion, kion li faris; kial vi ne montris al mi la leteron, kiun vi forsendis?* En ĉiuj ĉi frazoj kaj en sennombraj similaj la tempo-sekvo estas tiel evidenta, ke estus superflue ĝin signi per pezaj verbo-kompleksoj.

2. En la subprop-oj *lokaj*. Ekzemple: *mi iros tien, de kie vi venis*. Antaŭ- kaj posttempecon oni esprimas per *antaŭe* kaj *poste* en la subprop-o: *mi iris tien, kie vi estis antaŭe; dezerto troviĝis tie, kie poste oni konstruis tiun ĉi gigantan urbon; ni metos signeton tie, kie poste ni starigos la limŝtonon*.

3. En la subprop-oj *separativaj*. Ekzemple: *li foriris, sen ke oni tion rimarkis; anstataŭ ke vi babilis, ni estus devintaj lerni kune; anstataŭ ke ni estus lernintaj kune, vi babilis dum la tuta tempo; nenio okazis, krom ke alvenis malgrava letero*.

* Eble oni povus uzi tiuokaze la partcipdevenan *inte* anstataŭ la peza *antaŭe*:
... *kiu inte estis famekonata*.

Rim. II. Uzante kondicionalon, oni povas uzi la simplan formon, laŭ la ekzemplo de Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj. Tio devenas el tio, ke oni penas eviti en E-o la kompleksajn verboformojn, kaj prefere rigardas la kondicionalon simpla resuma formo por ĉiuj tri tempoj (vd. § 99).

4. En la subprop-oj *supozaj*. Tamen, certan relativecon oni trovas ĉe la kazo teoria (vd. § 257, I.). Pri la kondicionala tempo de la preterita kazo fiktiva validas la samo, kio pri la subprop-oj separativaj (vd. supre kaj § 255).

5. En la subprop-oj *koncedaj*.

6. En la subprop-oj *manier-indikaj*. En ili la tempo de la subprop-o kaj ĉefprop-o estas ĉiam la sama (vd. § 261). Vd. ankoraŭ sube la subprop-ojn tempajn (punkto 11.).

7. En la subprop-oj *komparaj*. En ili la subprop-a tempo estas ofte prezenco (prezenco eterna): *li tremis, kiel aŭtuna folio tremas*. Sed ĝi povas esti ankaŭ preterito aŭ futuro, kiam oni komparas ne al ĝenerala afero, sed al aparta, difinita ago: *li faros sian taskon same bone, kiel vi faris la vian*. Prezencon eternan oni trovas en la kvazaŭ-propozicioj, ĉar fiktive oni povas kompari nur supozon ĝenerale imagitan: *li iris, kvazaŭ li estus ebria*. Per la kompleksa verboformo (prezenco perfekta) oni esprimas antaŭtempecon, agon finitan: *li dormas, kvazaŭ li estus mortinta*.

8. En la subprop-oj *instrument-indikaj* (vd. § 264).

9. En la subprop-oj *konsekvenc-indikaj*. En ili la subprop-a tempo samtempa al la ĉefprop-a signas logike posttempecon, ĉar la konsekvenco de ago estas ja posttempa al la ago mem. La posttempecon do ne necesas marki aparte.

10. En la subprop-oj *kaŭz-adjektaj*. En ili la subprop-a tempo samtempa al la ĉefprop-a signas logike antaŭtempecon, ĉar la kaŭzo de ago estas ja antaŭtempa al la ago mem. La antaŭtempecon do ne necesas marki aparte.

11. En la subprop-oj *tempaj*. Tie ekzistas speciala kazo: nome, la tempa subprop-o montras per sia tempo la tempon de la ĉefprop-a ago, sed aliparte ĝi havas tempon absolutan. El tio sekvas, ke la ĉefa tempo de la subprop-o estas ĉiam identa je la ĉefa tempo de la ĉefprop-o kaj antaŭ- aŭ posttempecon oni povas esprimi nur per kompleksaj verbotempoj, helpe de la participo de l' kompleksa. Tion oni povas nomi tempoj *konformaj*. Pri rimedoj kaj ebloj eviti la kompleksajn formojn vd. la tempajn subprop-ojn (§ 246-249).

Rim. III. Oni trovas kelkfoje, ke en subprop-oj enkondukitaj per **post kiam**, antaŭ **ol**, de kiam, por pli drasta esprimo de la antaŭtempeco, preterito estas uzata apud ĉefprop-a prezenco aŭ futuro: *mi sendas la leteron tuj, post kiam mi ĝin finis* (= *estos fininta*, aŭ simple *finos*); *vi ne foriros, antaŭ ol vi respondis* (= *estos respondinta*, aŭ simple *respondos*) *mian demandon; de kiam li mortis* (*estas mortinta*), *ŝi estas nekonsolebla*.

Teorie oni povas tion pravigi per tio, ke ĉi tie **post kiam**, ekz-e, estas analizebla kiel **post tio ke**, kaj do temas kvazaŭ pri eksplika subprop-o kun tempoj relativaj. Tamen la supraj konstruoj ĝenas la leganton per sia nekutimeco kaj tial oni prefere

evitu ilin, uzante la parentezajn formojn. Ĉe simpla **kiam** (*mi sendos, kiam mi estos fininta*) kompreneble eĉ teorie ne estas pravigebla la rompo de la konformeco inter la verbotempoj.

☆☆☆

Tiujn ĉi detalajn konstatojn oni povus resumi mallonge jene:

Relativan tempon (kalkulatan ekde la ĉefprop-a tempo) oni uzas en la subprop-oj enkondukitaj per **ke**, krom se temas pri adjektaj, kaj en dependaj demandoj, respondantaj al la demandoj "kio?", "kion?", "pri kio?".

Absolutan tempon (kalkulatan ekde la efektiva nuntempo) oni uzas ĉie aliloke, en la rilataj kaj en la adjektaj subprop-oj.

2. LA VORTORDO

En E-o la vortordo estas libera, t.e. en ĝi ne ekzistas specialaj vortordoreguloj, oni devas klopodi nur je klareco kaj bonsoneco. Tamen, ankaŭ en E-o validas certaj principoj, kiujn malobei ne estas konsilinde, ĉar ili konformas al la natura irado de l' penso. Kaj eĉ ekzistas kelkaj maloftaj okazoj, kiam oni devas sin teni al fiksa vortordo.

La norma vortordo estas: subjekto, predikato, objekto, adjekto. Sangi tiun normon oni povas, eĉ ofte devas. Tio estas ebla, ĉar la akuzativa finaĵo garantias la nepran rekonon de la frazelementoj. Sed oni ne faru ŝanĝon senkaŭze, ĉar nur tiamaniere oni povas atingi, ke la ŝanĝo signifu ion, ke oni eksentu el ĝi certan nuancon: la akcentadon de iu frazelemento.

En la suba pritrakto ni esploras unue la ordinaran vortordon. Poste ni montros la okazojn de la ligita vortordo kaj fine ni eksplikos, kiel oni povas akcenti la diversajn frazelementojn per la lokado de la respektiva vorto.

Ordinara vortordo

Oni tenu sin laŭeble al la jena principo:

Ĉiu frazelemento staru apud tiu, al kiu ĝi senpere rilatas.

1. Interrilatantaj frazelementoj oni rigardi la *subjekton* kaj *predikaton*. Oni do loku ilin apude, aŭ almenaŭ oni ne intermetu multajn frazelementojn. Intermeteblaj estas:

a) adverba adjekto (ĉar ĝi same rilatas senpere al la predikato): *ŝi bele kantas*. Antaŭmeto akcentas la adverbbon: *bele ŝi kantas*.

b) personpronomo objekto, por eviti, ke ĝi staru frazfine (vd. sube § 274).

Cetere la subjekto-predikato-komplekson oni rigardu kvazaŭ nedisigebla tuto. Kiel tian oni povas ĝin laŭnecese ŝovi tien-tien ĉi en la frazo. Precipe validas tio pri la personpronomo subjekto. Oni do ne diru: *li en la ĝardeno hieraŭ kun mia amiko promenis*. Sed: *li promenis hieraŭ... aŭ: en la ĝardeno hieraŭ li promenis... aŭ: kun mia amiko li promenis... aŭ: hieraŭ kun mia amiko en la ĝardeno li promenis*.

Rim. I. Se tiaokaze oni tamen intermetas plurajn frazelementojn (participon aŭ adjekton statan aŭ modalan) oni metu ilin inter komojn: *fine li, post multaj malfacilaĵoj, sukcesis realigi siajn planojn; mi invitis lin, sed li, pro sia granda okupiteco, ne povis veni*. Tia intermeto estas konsilinda nur, se la personpronomo subjekto estas apogita per adverbo, konjunkcio k.s. (*fine li; sed li; li mem*).

2. Inter predikaton kaj ĝian infinitivan komplementon oni metu maksimume personpronoman objekton aŭ adverbon rilatantan al la infinitivo: *mi volus lin vidi; mi ne povas bone distingi*.

3. Oni loku apude la du partojn de kompleksaj verboformoj. Tamen estas pli elegante meti inter ili personpronomojn, demonstrativojn, adverbadjektojn; per tio oni iom malpliigas la efekton de ilia pezeco: *se mi estus lin vidinta; li estas ege ofendita; se mi estus tion sciinta*.

4. Neadverba adjekto (prepozitivo), precipe longa, staras ordinare post la objekto. Sed oni povas ĝin antaŭmeti:

a) por ĝin akcenti (vd. § 274, 5.);

b) se la objekto estas pli longa: *mi donis al la knabo multajn interesajn librojn.*

c) por klare distingi, ke temas pri adjekto kaj ne pri la suplemento de la objekto: *oni forprenis de la virino la infanon* (ies infanon, ne *la infanon de la virino*).

5. Epitetojn kutime oni metas antaŭe; sed oni povas loki ilin post la substantivo:

a) por ilin akcenti (vd. § 274, 6.);

b) se du epitetoj estas ligitaj per **kaj**: *li estas homo malgrandanima kaj ege avara.*

c) se ili havas suplementon: *vizaĝo plena de cikatroj; homo ŝatata de ĉiuj.*

Rim. II. Pri la antaŭmeto de la epiteto plus suplemento vd. sube ĉe la akcentado. La suplementon oni metas kutime post la postmetita epiteto, sed mallongajn personpronomajn suplementojn oni povas antaŭmeti al ĝi: *la libron de mi riceviton li perdis.* Tio estas eĉ preferinda. Tre malkonsilinde estas meti la suplementon antaŭ la epiteton. Oni do *ne* diru: *la per multaj klopodoj realigita projekto.* Tia konstruo estas pli tolerebla, kiam la substantivo havas mem suplementon: *ŝi sentis la en ĉiu homo denature troviĝantan deziron eltiri sin el mizero².*

d) en kelkaj kutimaj esprimoj: *Lingvo Internacia.*

e) ofte ĉe alparolo: *Patro nia; kara mia.*

Rim. III. Se ekzistas du epitetoj, la mallongan oni povas meti antaŭ, la longan post la substantivo, kiam la mallonga signas *okazan*, la longa *esencan* kvaliton de la respektiva ideo: *nova lingvo internacia; granda festo katolika.*

Ligita vortordo

Tian ligitan vortordon oni trovas precipe ĉe kelkaj adverboj, ĉe la rilativoj kaj ĉe la objektoj aŭ predikativoj en certaj okazoj.

273

I. Adverboj.

1. La adverbojn **ankaŭ** kaj **eĉ** oni metu antaŭ la vorton, kiun ili senpere rilatas. De ilia ĝusta loko, nome, dependas la preciza senco de la frazo: *Ankaŭ ŝi dancis hieraŭ en la korto* (krom aliaj ankaŭ ŝi); *eĉ li montris al mi la leteron* (ne nur aliaj, sed li mem).

Ŝi ankaŭ dancis hieraŭ en la korto (krom kanti ktp.); *li eĉ montris al mi la leteron* (ne nur parolis pri ĝi).

Ŝi dancis ankaŭ hieraŭ en la korto (krom hodiaŭ); *li montris eĉ al mi la leteron* (ne nur al la koncernatoj).

Ŝi dancis hieraŭ ankaŭ en la korto (krom en la ĉambro); *li montris al mi eĉ la leteron* (ne nur la kopion).

2. Pri **almenaŭ** validas la samo: *almenaŭ ili aprobis la principon* (dum aliaj tion eĉ ne faris); *ili aprobis almenaŭ la principon* (sed ne la ceteron).

Rim. I. Pro belsoneco, Zamenhof kutime metas la adverbojn *almenaŭ* kaj *ankaŭ* post la unusilaban personpronomon, kiun ili koncernas: *mi almenaŭ estas fortika en la religio; sed mi almenaŭ estas trankvila en mia koro; ĉu li ankaŭ troviĝis inter la amaso?; al vi ankaŭ mi konsilus meti atenton al la oficejaj lokoj.* Ne estas konsilinde tion imiti.

3. Ni vidis, ke la klarigan **ja** oni povas meti komence de la frazo: *ja mi ne esperis tion*, aŭ, se ĝi estas mallonga, ĉe la fino: *venu ja!* Sed en la okazoj, kiam ĝi emfazas nur unu vorton, **ja** devas stari ĝuste antaŭ tiu: *ili havos pacon, sed ja kruelan.*

4. Pri **ne** (Vd. § 91), kaj pri **nur** (Vd. § 90) validas la samo; pri **mem** (Vd. § 50), validas la malo.

Rim. II. Kiam la negacio koncernas predikativon post *esti*, Zamenhof kutime esprimas ĝin antaŭ la verbo *esti*: *vi ne estas tiu viro, kiu povus regi la venĝan glavon!*² – *palpu forte: ne estas ni fantomoj! Konvinkiĝu!*².

Rim. III. Pri la loko de la negacio ĉe *devi*, Vd. § 91, Rim. I.

5. **Ankoraŭ ne.** Zamenhof kutime metas la negacion antaŭ la verbo kaj **ankoraŭ** post ĝi: *ne venis ankoraŭ tempo, ke ni estu tro pedantaj²; vi ja ne povas ankoraŭ atingi la aĝon de 30 jaroj²; tio ne estas ankoraŭ ĉio, kion oni bezonas por povi instrui²; tial personoj, kiuj ne bone konas ankoraŭ la spiriton de la lingvo...².*

6. **Plu ne.** Ĉe *Z.* same **ne** staras ĉiam antaŭ la verbo, kaj **plu** staras plej-ofte antaŭe: *ŝi plu ne sciis²; mi min mem plu ne rekonas²; vi ne estas plu Moor!²* Kutime **nenion plu** staras kune: *mi havas nenion plu; ĉu vi nenion plu postulas?* Sed oni ne povas rigardi tion deviga, kaj estas permeseblaj ankaŭ la formoj: *ne sciis plu aŭ ne plu sciis* ktp.

II. Rilativoj.

1. Post **kies** oni metas senpere la determinaton, eĉ se predikativo: *la socia problemo, kies unu el la reprezentantoj kaj viktimoj ŝi estis²* (vd. § 57).

2. Se al iu vorto de ĉefprop-o rilatas rilativa subprop-o, ĝi devas tiun sekvi senpere. Tio estas farebla aŭ per inverso de vortordo aŭ per la intermeto de la subprop-o: *tie venas la homo, kiun ni atendas; la homo, kiun ni atendas, venas tie.* Do ĉe postmetitaj subprop-oj ĉiam la reprezentato venas en la finon de la ĉefprop-o, egale ĉu ĝi estas subjekto, objekto aŭ adjekto. Apozicion oni devas antaŭmeti, se ĝi havas suplementon, kaj, ĉe la ordinara vortordo, la subprop-o ŝajnas rilati al tiu ĉi suplemento: *filo de mia amiko, Karlo, kiun vi konas, mortis hieraŭ.* Ĉe la kutima vortordo (Karlo, filo de mia amiko) la subprop-o "kiun vi konas" ŝajnas rilati al la vorto "amiko". Vd. ankaŭ § 238.

III. Pri la vortordo ĉe:

1. la *predikativo*, vd. § 174, 1.

2. *nedeklinaciata rekta objekto*, vd. § 178, Rim. II.

3. *objekto* post *igi* aŭ *lasi*, vd. § 233, I, a, Rim. III.

Reliefigo de frazelementoj

274

La reliefigo de la diversaj frazelementoj okazas jene:

1. la *predikaton* oni akcentas metante ĝin antaŭ la subjekton: *kuregis la knabo per sia tuta forto, sed li ne povis atingi la papilion*. Tian inversigon oni uzas ĉiam en intermetitaj aŭ postmetitaj frazoj citantaj: "*venu – diris Petro – mi montros al vi la libron*"; "*vi estas prava*", *diris la knabino*. Sed oni ne uzu inversigon, se la subjekto estas persona pronomo: "*mi konsentas – li diris – via opinio estas tre trafa*"; "*vivu!*" ili *kriis unuanime*. Tute superflue, eĉ malbonefekte, estas postmeti la pronomon personan al ordonmoda verbo. Oni do ne diru: "Venu li". "Iru ni". "Laboru ili!" sed simple: "*Li venu!*"; "*Ni iru!*"; "*Ili laboru!*" Nome la postmetita persona pronomo ricevas fortan akcenton (vd. poste). Se oni volas speciale akcenti tiaokaze la verbon, oni povas ĝin emfazi per ja aŭ do: *li venu ja!*; *ili laboru do!*

2. La *subjekton*, se ĝi estas substantivo, oni povas akcenti per tio, ke oni faras el ĝi apartan propozicion kun estas, kaj el la predikato oni faras subpropozicion: *estis Paŭlo, kiu aranĝis la aferon; estis liaj amikoj, kiuj lin perfidis*. Superflua estas tio, se la subjekto estas sen tio akcentita per mem: *Paŭlo mem aranĝis la aferon*. Se la subjekto estas persona pronomo, sufiĉas ĝin postmeti al la predikato: *la aferon aranĝis mi; ni jam sufiĉe penis, nun penu ili*. En la dua propozicio de frazo oni same povas akcenti la subjekton per postmeto: *mi atendis Petron, sed venis lia frato; mi ne esperis, ke min akceptos tie ĉi konatoj*.

3. La *objekton* oni akcentas antaŭmetante ĝin al la subjekto plus predikato: *grandan ĉagrenon vi faris al mi; kondamnon mi ne timas; nur venĝon mi avidas²; eĉ muŝon li ne povas vidi suferi²*. Precipe ofte antaŭmetas Z. la infinitivan objekton: *uzi tion ni devas ĉiam eviti; diri tion oni povas tre ofte, sed ne ĉiam*.

4. La *predikativon* oni akcentas metante ĝin antaŭ la subjekto plus predikato: *granda estis mia ĉagreno; prezidanto oni lin elektis; dormi li ŝajnas*.

5. La *adjektojn* oni akcentas same per antaŭmeto: *en la ĝardeno tio okazis; senkaŭze li koleras*.

6. La *epitetojn* oni akcentas kutime per postmeto: *tio estas supozo absurda*. Precipe ĉe slavaj e-istoj oni trovas la disigon de substantivo kaj epiteto per la intermeto de predikato: *kaj strange: ju pli civilizita estas lando, des pli grandan ĝuas sukceson la kuracfuŝistoj; mi estas certa, ke brilan vi havos sukceson*. Tia uzo estas plene rajtigita, ĉar pro la akordiĝo de substantivo kaj ĝia epiteto ilia kunaparteno estas ĉiam klara. Ĝi do meritas esti ĝenerale uzata por la tre forta akcentado de la epiteto. Same fortege akcentas la epiteton, se ĝian komplementon oni metas inter ĝi kaj la postsekva substantivo: *ni eniris la plenplenan de homoj salonon*. Tion uzas precipe la slavoj, ofte sendistinge, aliflanke ĝin tute evitas okcidentanoj. Oni devus ĝin uzi ĝenerale, sed rezervi por la akcentado de l' epiteto.

Kiel ni vidis, la loko de l' plej forta akcento estas la komenco de la frazo; tiu akcento tamen ne validas por la subjekto, ĉar tie ja estas ĝia loko kutima. Alia akcenta loko estas la fino de la frazo. Precipe validiĝas tiu akcento por la unusilabaj vortoj, ĉar ili sekvas tie senakcentan silabon kaj post ili sekvas paŭzo. Sed tia akcento por la vortoj *min*, *vin*, *lin*, *ŝin*, *ĝin*, *nin* plejofte ne estas dezirinda. Krome ili estas oftaj elementoj, kaj, se oni metas ilin frazfine, povas okazi, ke pluraj sinsekvaj frazoj finiĝas per ili, kio donas monotonan efekton kaj nebonvenan rimadon. Zamenhof mem atentigis pri tio, dirante, ke li metas ĉiam gravan elementon al la fino de la frazo (Vd. Lippmann: *Dr. Z-s Sprachliche Gutachten*, pĝ. 9). Oni do loku tiujn vortetojn kvazaŭ en ombro, plej oportune antaŭ la predikato: *multaj homoj lin akompanis*; *en granda mizero mi lin trovis*. Post la predikato nur, se sekvas ankoraŭ frazelementoj: *multaj homoj akompanis lin en la tombejon*; *mi trovis lin en granda mizero*.

Precipe volonte antaŭmetas Z. la pluralan personpronomon: *mi ilin vidis*.



Kompreneble ekzistas komplikaj frazkonstruoj, en kiuj oni devas neeviteble peki kontraŭ iu el la supre skizitaj reguloj. De lerteco kaj stilpreteco dependas, ke oni tiaokaze trovu la malplej malbonan eblon kaj kiel eble konservu la ekvilibron kaj la kompreneblecon de la frazo. La ĉefaj principoj estas: klaro kaj bonsoneco.

LA VORTFARADO

275

En la unua parto de ĉi tiu libro ni okupiĝis pri la Vorto el tri vidpunktoj: ni esploris ĝian grafikan prezentadon, ĝian sonan konsiston kaj ĝian morfologion kune kun la uzado de la diversaj morfologiaĵoj. En la dua parto ni eksplikis, kiel esprimi la penson grupigante vortojn en frazon laŭ la sintaksaj reguloj. Restas pritrakti la esprimon de penso inter la muroj de vorto, t.e. prezenti la konstruadon de vortoj, la Vortfaradon.

Rim. Povus ŝajni, ke ĉi tiu studobjekto apartenas al la parto "Vorto", estante malpli alta grado de gramatiko ol la sintakso. Kaj ni tiel ja klasis ĝin en la antaŭaj eldonoj. Sed, efektive, kiam oni faras kunmetitan vorton, oni propre kundensigas en ĝi elementojn sintakse interrilatajn, ekz-e suplementon kun ties determinato (*homkoro* = koro de homo), adjekton kun ties verbo (*martelbati* = bati per martelo). La vortfarado do kondiĉas sintaksan konstruadon.

Tamen la leĝoj de la frazkonstruo (sintakso) kaj de la vortfarado (sintezo) ne estas tute identaj: tiuj de ĉi lasta estas pli striktaj (Vd. § 290).

★★★

Ni avertas: la reguloj prezentotaj ne estas unuanime akceptitaj de gramatikemuloj. Tamen, por trankviligo, ni certigas la studonton, ke la kontraŭbatalantoj de la eksplikita sistemo ne ellaboris ĝis nun alian sistemon akcepteblan, kaj ke ankaŭ ili mem uzas la lingvon laŭ la ĉi-sekve starigitaj reguloj. Ĉi tiuj reguloj ja simple konstatas la zamenhofan kaj la ĝenerale kutiman manieron de vortfarado kaj ili baziĝas ankaŭ sur pluraj signoj troveblaj en la Fundamento. La sistemo nenie kolizias kun la lingvouzo, kaj krome ĝi estas ekstreme elasta, responda kun tiu elasteco, al kiu Esperanto dankas sian nekontesteblan superecon. Tiuj cetere estas la motivoj, kial la Akademio oficialigis la kondensan sistemon, kiun, en akordo kun ni du, D-ro Albault, Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, pretigis, kaj kiu aperis en la "Aktoj de la Akademio 1963-1967", p. 55-70.

Ni esprimas nian ŝuldon, krom al tiuj menciitaj en la Antaŭparolo, al H.A. de Hoog, kies libreto *La senpera verbigo de adjektivoj* estis tre utila dum la tralaboro de kelkaj partoj, kaj al John C. Wells, por lia bona konsilo pri la grafika prezento de vortanalizoj.

Ĝeneralajoj

En ĉiu lingvo oni distingas vortojn primitivajn aŭ simplajn kaj vortojn malsimplajn, devenintajn el la primitivaj. Efektive, la nombro de la

ideoj, kiujn povas koncepti homa spirito, estas tiel granda, ke, se oni devus esprimi ilin ĉiujn per apartaj primitivaj vortoj, la penado estus troa por la homa memoro.

Por eviti tiun malhelpon, la lingvoj povas uzi tri rimedojn:

1. se unu esprimota ideo ŝajnas sufiĉe najbara al alia, por ke oni povu ĝin esprimi per la sama vorto, la lingvo etendas ties signifon de unu objekto al la alia: tiel oni parolas pri *folio* (el papero), aludante pri folio de arbo, pri la *piedoj* de tablo, pri la *nodo* de intrigo ktp. Tiun procedon oni nomas *metaforado*.

2. se la koncerna ideo, kvankam parenca al alia, tamen diferencas de ĝi almenaŭ per bezonata nuanco, oni ofte ĝin esprimas per malgrava modifo de la komenco aŭ de la fino de la primitiva vorto: ekz-e antikvan arbaron oni nomas *praarbaro*, malgrandan domon oni signas per *dometo*. Tiun procedon oni nomas *derivado*.

3. se la koncerna ideo estas mem malsimpla kaj povas esti analizata per du aliaj, oni ofte penas ĝin esprimi per kunmeto de la du simplaj vortoj: ekz-e la ideon pri *miraĝo* oni povas analizi kiel iluzion de la vidado, kaj esprimi per *vid-iluzio*; la ideon pri ferio same per *liber-tempo* ktp. Tiun procedon oni nomas *kunmetado*.

Ne ĉiu lingvo prezentas egalan disvolvigon de ĉiu el tiuj tri procedoj: tiuj, kiuj emas al kiel eble plej kompleta nevarieco de la vortformoj, uzas precipe la metaforadon; aliaj, kiujn regas analiza tendenco, uzas preskaŭ nur la derivadon; la kunmetado floras ĉefe en la lingvoj, kiuj konservas vive la senton pri la memstareco de la diversaj lingvoelementoj kaj pri ties relativa interŝanĝebleco. Al tiu ĉi lasta grupo apartenas Esperanto, kaj tial la kunmetado estas en ĝi la esenca rimedo de vortfarado.

El la tri supre difinitaj procedoj, ni ne tuŝos ĉi tie la metaforadon: ĝi efektive estas fremda al la gramatiko. Kiam la metaforoj estas ĝenerale uzataj kaj banaliĝintaj, ili estas objekto de leksikologio; kiam ili estas freŝaj aŭ nur provitaj, ili estas objekto de stilistiko.

En la sekvantaj paĝoj ni unue analizos, sub la titolo "*La Vortkonsisto de la Lingvo*", la diversajn elementojn de la lingvoŝtofo, kaj precizigos iliajn karakterojn; due, sub la titolo "*Kunmetado*", ni studos la ĉefan procedon uzatan de Esperanto por fari novajn vortojn; trie sub la titolo "*Derivado*", ni montros, kiel tiu ĉi procedo havas tamen sian apartan, kvankam malgrandan, lokon en la lingvo; fine, sub la titolo "*Kritiko de la Esperanta Vortsistemo*", ni esploros la valoron de la vortfara instrumento liverita de Zamenhof kaj praktikata de liaj posteuloj.

I. LA VORTKONSISTO
DE LA LINGVO

LA LINGVO-ELEMENTOJ

276

En la antaŭa paragrafo ni jam avizis, ke en Esperanto regas la simpla kunmetado de la diversaj vortelementoj aŭ lingvoelementoj. Nun ni esploras ĉi tiujn elementojn ĝenerale: unue, ĉu ilia *formo* estas konstanta aŭ varia; due, en kiajn *specojn* ili dividiĝas

1. **F o r m o.** Speciala karakterizaĵo de la E-aj lingvoelementoj estas ilia *neŝanĝebleco*. T.e. ili regule konservas sian originan formon, kaj kun tiu sama formo ili gluiĝas (aglutiniĝas) unu al la alia. Pro tio oni nomas E-on *aglutina* lingvo, male al la lingvoj *fleksiaj*, en kiuj la elementoj, aŭ almenaŭ parto de ili, ŝanĝas sian formon.

Komparu la anglan *to sing* kaj *song*, la francan *pluie* kaj *pleuvoir*, la germanan *schreiben* kaj *Schrift* kun la E-aj *kant-i* kaj *kant-o*, *pluv-o* kaj *pluv-i*, *skrib-i* kaj *skrib-ajo*.

Zamenhof mem skribas pri tio (F. K. 17a eldono, pĝ. 234): "Mi aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj* vortoj... Ĉiu vorto sin trovas *ĉiam* kaj *sole* en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per la kunigo de *senŝanĝaj* vortoj". Kiel oni vidas el ĉi tiu teksto, Zamenhof nomas ĉiun lingvoelementon vorto, egale ĉu tiu estas vortradiko, prefikso, sufikso aŭ finaĵo. Pri la finaĵoj (a, e, i, o ktp.) cetere diras la 11a regulo de la Fundamenta Gramatiko: "la gramatikaj finaĵoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj". En la sama paragrafo tekstas: "Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino)", Anstataŭ "vortoj" ni parolis ĉi-supre pri "neŝanĝeblaj lingvoelementoj".

La sola escepto el tiu neŝanĝebleco troviĝas ĉe la sufiksoj *ĉj* kaj *nj*, antaŭ kiuj oni povas elizii literojn: *patro* kaj *paĉjo*, *patrino* kaj *panjo*.

Tamen, ĉar la devenlingvoj de Esp-o estas fleksiaj, oni trovas ties postsignojn: *agi*, *akto*, *reakcio*; *instrui*, *instrukcio*; *projekti*, *projekcio*; *procedi*, *proceso*; *tondi*, *tonsuro*; *proponi*, *deponi*, *disponi*, *imponi* – *supozi*, *pozi*, *ripozi*, *ekspozicio*; *efiki*, *efekto*; *negliĝi*, *neglekti*; *inteligenta*, *intelekto*; *meti* – *promesi*, *permesi* – *kompromiti*, *intermiti* – *kompromiso*; *konduki* – *konduti* – *dedukti*, *redukti*, *indukti*, *produkti*; *fikcio*, *fiktiva* ktp. Sed el la vidpunkto de la vortfarado tio estas sensignifa, ĉar tiuj diversaj formoj estas rigardataj kiel apartaj radikvortoj. Nur ĉe formado de kelkaj novaj vortoj validiĝas tiu fleksieco, precipe ĉe elimino de pseŭdosufiksoj: *inerta* el *inercio*; *erupti* el *erupcio*; *ekskludi* el *ekskluziva* ktp.

2. **D i v i d o.**

Oni distingas en E-o radikojn, afiksojn kaj finaĵojn.

1. La *radikoj* estas silaboj aŭ silabaroj, kiuj signas ian koncepton: objekton aŭ nocion (*hom*, *bel*, *kur*).

2. La *afiksoj* estas silaboj, kiuj nuancas aŭ modifas la sencon de la radikoj, al kiu ili gluiĝas, sed influas nek ĝian gramatikan karakteron, nek ĝian vortkonstruan funkcion. Dum la radikoj ligiĝas inter si laŭ certaj vortkunmetaj reguloj, pri la afiksoj ne validas reguloj ĝeneralaj.

La afiksoj povas esti *sufiksoj* (post-afiksoj) kaj *prefiksoj* (antaŭ-afiksoj).

a) *Sufiksoj* (et, eg, aĉ, um). La tri unuaj ne influas la gramatikan karakteron de la antaŭa radiko; tiu kvazaŭ travidiĝas tra la sufikso; tial tiujn sufiksojn oni nomas *diafanaj*. Um faras el la radikoj kvazaŭ novajn radikojn, kiujn oni devas aparte lerni.

b) *Prefiksoj* (bo, eks, ge, mal, pra). Ili gluiĝas al la posta radiko sen oboe al vortkunmetadaj reguloj, farante el ĝi kvazaŭ novan radikvorton kun nuancita signifo.

Oni nomas sufiksoj en E-o ankaŭ silabojn, kiuj funkcias en vortkunmetoj same kiel la radikoj kaj obeas la samajn vortkunmetajn leĝojn. Ili estas propre radik-anstataŭaĵoj pli oportunaj por vortkunmeto. Tiaj estas ekzemple: *il* (instrument), *ec* (kvalit), *ist* (profesiul), *an* (membr), *em* (inklin) ktp. Same, oni nomas *prefiksoj* ankaŭ silabojn, kiuj estas regataj de samaj vortkunmetaj leĝoj, kiel radiko staranta antaŭ radiko (*ek, dis, re, for*). Fakte, doni al ili la nomon afikso estas erare, eĉ konfuze. El la vidpunkto de la vortkonstruo ili povas esti klasitaj inter la ordinaraj radikoj. Tamen, ili havas kelkajn specialaĵojn (vd. § 323), pro kiuj necesas ilin distingi. Ni nomos tiujn elementojn *afiksoidoj* (*sufiksoidoj* kaj *prefiksoidoj*). Por eviti konfuzon, la proprasencajn sufiksojn kaj prefiksojn ni nomos ĉiam *sufiksoj* kaj *prefiksoj veraj*. Kaj, ĉar pri vera *derivo* oni povas paroli en E-o nur koncerne ilin, ni povas nomi ilin ankaŭ *deriviloj*.

Rim. Inter la veraj afiksoj kaj radikoj ekzistas tuŝpunktoj. Unue, vera afikso povas akiri funkcion de radiko, alpreninte finaĵon (eta, ega, aĉa, eksa, praa ktp.). Due, vera radiko povas akiri funkcion de vera prefikso, do fari vortkunmeton sen oboe al vortkunmetaj leĝoj, *derivilo* el radiko kvazaŭ novan radikon kun modifita signifo (dikfingro, junedzo, vicreĝo). Tion oni povas nomi *prefiksigo de radiko*.

3. La finaĵoj estas sonoj, kiuj staras je la fino de ĉiuj E-aj substantivoj, adjektivoj kaj verboj, kaj de ĉiuj adverboj escepte la primitivajn (vd. §§ 88-91, 278). Ili estas: *o, a, e, i, as, is, os, us, u*. Ili distingiĝas de la ceteraj elementoj per tio, ke ili ne povas stari antaŭ alia finaĵo (krom du-tri esceptoj), sed en tia okazo devas esti anstataŭigataj per sinonima sufiksoido. Krome ili havas plurajn funkciojn gramatikajn: *-o* signas la substantivecon kontraste al *-a*; sed ankaŭ la singularon, kontraste al *-oj*; kaj la nominativon, kontraste al *-on*. Tamen cetere, laŭ la eldiro de Zamenhof, ili povas esti rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

El la supra pritrakto ni povas tiri la regulon:

Laŭ sia envorta funkcio ĉiuj lingvaj elementoj estas aŭ povas esti memstaraj kaj la vortfarado okazas per la kunmeto de memstaraj elementoj.

MEMSTARECO KAJ SOLSTARIVO

La memstareco de la elementoj validas tamen nur pri ilia envorta funkcio, kaj ĝi ne signifas, ke ĉiu elemento povas esti uzata ankaŭ sola kiel aparta, memstara vorto. El tiu ĉi vidpunkto estas distingeblaj:

1. Elementoj *kompletigendaj* aŭ *finaĵbezonaĵaj*. Tiaj estas la *radikoj* kaj *afiksoj*. Ili devas esti kompletigitaj per finaĵo por formi memstaran

vorton (homo, bela, kuri).

2. Elementoj *solstarivaj*. Tiaj estas la Tabel-vortoj, rilatvortoj (prepozicioj, konjunkcioj), primitivaj adverboj (tre, tro, jam, apenaŭ), numeraloj, interjekcioj ktp. Ili ja povas alpreni finaĵon (troa, antaŭo, ĉiea, due, fia), sed povas stari ankaŭ solaj.

Rim. I. El la verbaj prefiksoj longan tempon sole for estis uzata solstare, sed en la lastaj jaroj okazis provoj ankaŭ por la solstarigo de la aliaj verbaj prefiksoj: *dis*, *re*, *ek*.

3. Elementoj *kompletigaj*. Tiaj estas la finaĵoj (o, a, i, e). Ili ne povas stari solaj; ilia funkcio estas fari el **radiko** (hom, bel, kur) **vorton** (homo, bela, kuri), aŭ pluformi solstarivajn elementojn (kuna, kioma, ĉirkaŭi, milo, apenaŭa).

Rim. II. La supra divido de la elementoj plene validas, almenaŭ en la klasika kaj proza lingvo. En la poezia lingvo oni povas elizii la o-finaĵon kaj per tio kvazaŭ solstarigi la radikojn (hom', bel', kur'). Sed tiu ĉi solstarigo estas nur ŝajna. La o-finaĵo propre ne perdiĝas: ĝin markas apostrofo kaj ankaŭ la loko de la akcento, kiu restas samloke, kie ĝi estus sen la elizio (kurəd', element', fier'). Krome, ĉar la o-finaĵo estas la sola eliziebla finaĵo, oni povas diri, ke ĉe radikoj la manko de finaĵo estas samsignifa al o-finaĵo (*bel'* estas ne *bela* sed *belo*, *kur'* estas ne *kuri*, sed *kuro*); per tio la o-finaĵo, malgraŭ la elizio, restas evidente markita kaj rekonebla.

En la poezio okazis provoj ankaŭ pri la elizio de la a-finaĵo, parte malkaŝe (Grabowski: *kelk* anstataŭ *kelkaj*), parte kaŝe per la kuŝrando de adjektivo kaj substantivo (Grabowski: *bel-poto*, *tut-arbaro*, *fort-emocio*: estas evidente, ke ĉi tiuj estas nenio alia ol *bel-poto*, *tut-arbaro*, *fort-emocio*). Ĉe kelkaj malmultaj vortoj, precipe kvantesprimaj (kelk, mult, tut, last) tia uzo kiel poezia licenco eble ne estas nepre kondamninda, sed ĝia ĝeneraligo estas absolute evitinda, ĉar ĝi povas naski miskomprenon per la rompo de la ekskluziveco de l'o-finaĵa elizio kaj malhelpas ankaŭ la facilan komprenon, kiu estas garantiata ĝuste per la finaĵa distingo de ĉiu aparta vorto.

Alia provo estis: uzi memstare la finaĵon o; ekzemple: *ne forgesu pri l' o dirita*. Tia uzo gramatike kaj Fundamente estas plene rajtigita, sed ĝi tamen ne povis ekradiki; verŝajne pro tio, ke ĝi necesigus maloportunajn formojn (l' ojn necesajn, ktp.).

Grabowski iniciatis ankaŭ la memstaran uzon de la verbaj finaĵoj kiel poezian licencon (*stelo as turnita*, *la patro as fore*). Oni povas riproĉi al tia uzo, ke ĝi aplikas *as* anstataŭ *estas*, kvankam la verbaj finaĵoj signifas ne nur *est*, sed ankaŭ, kaj eĉ plejparte, *funkcii* aŭ *agi*.

Nu, kvankam la tradicio povus fiksi tian sencon al la memstare uzata verba finaĵo, tamen la iniciato de Grabowski eĉ en la poezio apenaŭ estis imitata, eble ĉar Z. neniam uzis, eĉ se teorie aprobis ĝin (en 1908, li proponis al la L. K. permesitajn, kiel neologismon). Lastatempe oni povas renkonti la mallongigon *'stas* (*ĉiu 'stas...*) en la poezia lingvo. La tempo montros, ĉu ĝi prosperos plie.

VORTKATEGORIOJ KAJ RADIKKARAKTEROJ

278

En E-o, kiel en ĉiu alia lingvo, ni distingas la sekvantajn gramatikajn kategoriojn:

1. *Substantivo*. Ĝi signas la *nomon* de ideo (konkretaĵo, abstraktaĵo, ago). En E-o ĝi ĉiam alprenas la finaĵon *o*. Ekzemple: domo, scienco, belo, kuro, bato.

2. *Adjektivo*. Ĝi signas, ke la ideo esprimita de la vorto rilatas al alia vorto kaj montras ties kvaliton aŭ rilaton. En E-o ĝi ĉiam alprenas la finaĵon *a*. Ekzemple: doma, scienca, bela, kura, bata.

3. *Adverbo*. Ĝi signas, ke la ideo esprimita de la vorto rilatas al verbo, montrante la cirkonstancon aŭ manieron de ago (rapide kuri, home senti, martele bati, arbare promeni, kure atingi, subite malaperi, apenaŭ senti, tuj veni, tro rapidi) aŭ pli strikte difinas adjektivon (tre bona, anĝele bela, naŭze aĉa), aŭ alian adverbon (eksterordinare brile, tre bone). Ecepte de la primitivaj adverboj (tre, tro, apenaŭ, morgaŭ, tuj, jam ktp.), la adverbo en E-o alprenas la finaĵon *e*.

4. *Verbo*. Ĝi signas agon aŭ staton de iu aŭ io plenumatan aŭ suferatan en certa tempo kaj modo. En E-o ĝi alprenas la verbajn finaĵojn (iri, oni venas, oni martelis, oni pravos, sciŭ, oni dirus).

5. Fine ekzistas diversaj vortoj, kiuj apartenas al neniu el la supraj kvar kategorioj, kaj kiujn oni povas nomi *partikuloj*: prepozicioj, subjunkcioj, konjunkcioj, interjekcioj. Ili estas solstarivaj, senfinaĵaj. Tamen, pluraj el ili povas alpreni finaĵojn: ĉirkaŭa, fie, hurai.

Rim. I. Ankaŭ la primitivaj adverboj povas alpreni finaĵojn: troa, ĉiea, morgaŭo.

Rigardante la radikojn *hom*, *bel*, *kur*, oni imagas ilin nevole en diversaj funkcioj.

Ĉe *hom* oni imagas nomon de estaĵo. Same ĉe *dom*, *tabl*, *patr* (nomoj de konkretaĵoj); *scienc*, *muzik*, *gramatik* (nomoj de abstraktaĵoj).

Ĉe *bel*, *bon*, *klar* oni imagas kvaliton de iu objekto aŭ ideo.

Ĉe *kur*, *bat*, *ag*, *perd*, *sid* agon aŭ staton plenumatan aŭ suferatan en certa tempo kaj modo.

Do kvazaŭ trudiĝas: la almeto de o-finaĵo al *hom*, *dom*, *scienc*, *muzik* (homo, domo, scienco, muziko); la almeto de a-finaĵo al *bel*, *bon*, *klar* (bela, bona, klara); la almeto de verba finaĵo al *kur*, *bat*, *perd* (kuri, bati, perdi).

La radikojn, kiuj elvokas nomon de ideo, oni nomas *radikoj substantivaj*; tiujn, kiuj elvokas kvaliton de ideo aŭ objekto, *radikoj adjektivaj*; tiujn, kiuj elvokas agon aŭ staton en certa tempo kaj modo, *radikoj verbaj*.

La radikoj do havas aŭ substantivan aŭ adjektivan aŭ verban karakteron. Ĉe la plejparto de la radikoj estas tute evidente, al kiu kategorio ili apartenas. Ĉe kelkaj tamen, oni ne povas nepre konstati la karakteron: la kategorion de tiaj radikoj montras la Vortaro per la nacilingva traduko. Ekz-e *komb* kaj *aŭgur* estas tradukitaj per verboj, *bros* kaj *profet*

per substantivoj, do la antaŭaj estas verbaj, la postaj estas substantivaj radikoj.

Rim. II. En la Fundamenta "Universala Vortaro" estas speciale zorgate pri tio, ke la karaktero de la radiko estu ĝuste fiksita, se la plursenca nacilingva tradukvorto povus esti miskomprenon. Ekz-e oni trovas tie:

nobel = F *noble* (subst.), sed **nobl** = F *noble* (adj.);

bor = A *bore* (verb.); **pres** = A *print* (verb.); **vel** = A *sail* (subst.).

Do ne nur la kategoria divido, sed ankaŭ la nomo de la diversaj kategorioj devenas el la Fundamento mem.

Krom la tri supraj ĉefaj kategorioj ni povas distingi ankoraŭ kvaran, la *kategorion adverban*. Ekz-e *subit*, *nepr* estas nevole imagataj en adverba funkcio. Tio validas ankaŭ pri la primitivaj (solstarivaj) adverboj (*tro*, *tuj*, *apenaŭ* ktp.). Tamen, el la vidpunkto de pluformado kaj vortfarado, ĉi tiu kvara kategorio estas neglektebla, ĉar la vortoj kaj radikoj al ĝi apartenantaj kondukas ĉe la vortfarado kiel radikoj adjektivaj. Adverbo kaj adjektivo ja havas funkcion saman: la adverbo karakterizas ne substantive esprimitan objekton aŭ ideon, kiel faras la adjektivo, sed verbe esprimitan agon, adjektive esprimitan kvaliton aŭ adverbe esprimitan manieron. Tion montras, ke, formante substantivon el verbo, adjektivo aŭ adverbo, ties adverbo fariĝas adjektivo: *rapide kuri* - *rapida kuro*; *tuj veni* - *tuja veno*; *tro varme* - *troa varmo*. La adverbo do estas plie morfologia-sinetia ol vortfarada kategorio. En la vortfarado la adverbajn radikojn ni povas klasi simple inter la adjektivajn kaj rigardi kiel devenigitajn el tiuj. Ĉe la primitivaj, kompreneble, la adverbeco estas markata per "signo nula": *tuja* - *tuj*, *troa* - *tro*, *apenaŭa* - *apenaŭ*.

Ni okupiĝos do nur pri la tri ĉefaj kategorioj: pri la radikoj substantivaj, adjektivaj kaj verbaj.

SAMELEMENTAJ KAJ MALSAMELEMENTAJ VORTOJ

279

Provizore oni kontentu pri la ĉi-supraj pruvoj de tio, ke la radikoj dividiĝas en tri kategoriojn ĉefajn kaj ke la simbolo de tiuj tri kategorioj estas la tri finaĵoj *-o*, *-a* kaj *-i*. Poste ni esploros ĉion ĉi ankoraŭ pli detale kaj provos fiksi ankaŭ la precizan signifon de la finaĵoj.

Oni rigardu jenan serion da vortoj:

homo, *domo*, *martelo*

bela, *bona*, *prava*

kuri, *bati*, *dormi*.

En ĉi tiuj vortoj la finaĵo respondas al la karaktero de la radiko, ĝia signifo jam estas entenata de la radiko mem. Sekve, se ni signas parenteze tiun karakteron per la respektivaj finaĵoj, ni ricevas la sekvantan serion:

hom(o)-o, *dom(o)-o*, *martel(o)-o*

bel(a)-a, *bon(a)-a*, *prav(a)-a*

kur(i)-i, *bat(i)-i*, *dorm(i)-i*.

La samon ni vidas ĉe la sekvantaj sufiksoidoj:

in(o)-o, ul(o)-o, ej(o)-o, ing(o)-o
eb(l)a-a, em(a)-a, ind(a)-a
ig(i)-i, iĝ(i)-i.

Gramatike, en ĉi tiuj vortoj la finaĵo ja ne estas superflua, ĉar ĝi montras ankaŭ la nominativon, aŭ, ĉe verboj, la tempon kaj modon; sed el la vidpunkto de la *vortfarado* ĝi estas pleonasma, ĉar ĝi nenion aldonas al la senco de la nuda radiko. Tiujn vortojn, en kiuj la radik-karaktero kaj la finaj-karaktero estas identaj, oni nomas *vortoj samelementaj*.

Sed nun ni donu al radikoj finaĵon nekonforman al ilia gramatika karaktero:

homa, kura, -iga
belo, bato, -iĝo
marteli, pravi, emi.

Se ni ĉi tie signas per parenteza finaĵo la radik-karakterojn, la vortoj aspektos jene:

hom(o)-a, kur(i)-a, -ig(i)-a
bel(a)-o, bat(i)-o, -iĝ(i)-o
martel(o)-i, prav(a)-i, em(a)-i.

Estas evidente, ke ĉi tie la finaĵo jam signas ne nur kazon aŭ konjugacian formon, sed krome ĝi donas al la radiko tian karakteron, kian ĝi ne havas per si mem. Ĝi do neniel estas pleonasma, ĝi estas vortformilo, estas "rigardata kiel memstara vorto". Tiajn vortojn, en kiuj la finaĵoj havas tian vortfaran, karakterŝanĝan funkcion, oni povas nomi *malsamelementaj vortoj*, ĉar la karaktero de la radiko kaj de la finaĵo diferencas. Kaj, kontraŭe al la *finaĵo pleonasma*, oni povas paroli ĉi tie pri *finaĵo proprafunkcia*.

Kiel oni vidas el la supraj ekzemploj, *al ĉia radiko oni povas kroĉi ĉiun ajn el la finaĵoj*, se la tiel estiĝanta vorto entute havas sencon.

Tiuj gramatikemuloj, kiuj diras la E-ajn radikojn senkarakteraj (aŭ plurkarakteraj), bazas ĉi sian opinion sur tiu interŝanĝebleco de la finaĵoj: *martelo, marteli, martela; kuri, kuro, kura; prava, pravo, pravi*. Ili — oni devas supozi — ne esploris la aferon pli profunde ol ĉi tiu punkto: ili ne demandis, kio okazas, se oni volas plufirmi vortojn malsamelementajn. Sed antaŭ ol pritrakti ĉi tion, ni vidu la propran sencon de la finaĵoj.

LA PROPRA SIGNIFO DE LA FINAĴOJ

Ĝis nun ni manipulis la tri ĉefajn finaĵojn, ne precizigante ilian sencon. Ni provu do ilin difini.

1. La *o-finaĵo* laŭ Zamenhof signifas: "kio estas, ekzistas", ĝi esprimas do: "io ekzistanta en si mem". Alivorte oni povas diri ankaŭ tion, ke ĝi signifas la *nomon* de io.

a) La substantivaj radikoj reprezentas jam en si mem ion konkrete ek-

zistantan, kaj, oni povas diri, ili signas ankaŭ sian propran nomon. Ili do havas en si ĉiujn signifojn de la o-finaĵo, do estas kompreneble, ke post ili la o-finaĵo, kiel vortformilo, estas pleonasma.

b) La adjektivaj radikoj havas la econ, ke ili karakterizas ian objekton aŭ ideon, montrante ties kvaliton. La o-finaĵo gluita al ili montras, ke ili "ekzistas", estas rigardataj ne kiel rilatantaj al io, sed en si mem kiel memstarajoj. Alivorte la o-finaĵo signas la *nomon* de la respektiva kvalito esprimata de la adjektiva radiko.

c) Post verbaj radikoj, same, la o-finaĵo montras, ke la vorto ne reprezentas verbon, kiu montras agon aŭ staton en certa tempo, modo kaj aspekto, sed ĝi esprimas la agon aŭ staton kiel koncepton. T.e. la o-finaĵo signas la *nomon* de ago aŭ stato esprimata de la verba radiko.

Rim. Ni montrons sube (§ 286), ke la senco de la o-finaĵo ne estas tiel rigida, sed ĝi permesas konsiderindan elastecon en la vortsignifo.

2. La **a-finaĵo** montras, ke la radiko, al kiu ĝi algluiĝas, rilatas al alia vorto, karakterizante tiun. Ĝia eco do estas perfekte la sama, kiel tiu de la adjektivaj radikoj, sekve apud ĉi tiuj ĝi estas ĉiam pleonasma kiel vortfarilo; do la a-finaĵaj adjektivaj radikoj montras ĉiam *kvaliton* de io aŭ iu, epitete. Post substantivaj kaj verbaj radikoj ĝi estas proprafunkcia kaj povas signi:

a) kvaliton, ekz-e: *reĝa sinteno, nutra manĝaĵo*;

b) rilaton, apartenecon, ekz-e: *reĝa palaco, nutra komitato*.

3. La **verbaj finaĵoj** montras, ke tempe-mode-aspekte okazas ago aŭ daŭras stato. Apud la verbaj radikoj, signifantaj jam en si mem agon aŭ staton, ili do estas pleonasmaj kiel vortfariloj, kaj signas per sia speciala formo (*as, is, os, us* ktp.) nur la tempon aŭ la modon de la respektiva ago aŭ stato. Post substantivaj aŭ adjektivaj radikoj, ili signas agon aŭ staton, kies karakterizon aŭ esencon donas la substantiva aŭ adjektiva radiko: ekz-e *marteli*: agi karakterizate de martelo; *sufiĉi*: stati karakterizate de "sufiĉa".

FINAJA PLUFORMADO

281

I. Kiel oni vidis, la vortoj *samelementaj* estas pluformeblaj per la simpla ŝanĝo de finaĵo. La finaĵo en ili estas pleonasma, do antaŭ la nova finaĵo povas elfali sen anstataŭigo:

martel(o)-o > martel(o)-i

hom(o)-o > hom(o)-a

ĉar la substantiveco de *martelo* kaj *homo* jam enestas en la radiko mem, do restas markita ankaŭ en la vortoj *marteli* kaj *homa*. Sed tiamaniere estiĝas vortoj malsamelementaj, en kiuj la karaktero de la radiko kaj tiu de la finaĵo ne identas.

Nu, se oni volas pluformi tiajn vortojn *malsamelementajn*, la afero estas iom malpli simpla. Ni vidis ja, ke la finaĵoj en malsamelementaj vortoj estas proprafunkciaj, havas propran signifon. Se ĉe la pluformado oni

volas konservi tiun finaĵan signifon (ekz-e se oni volas nomi la *agon marteli*), oni ne povas simple ŝanĝi la i-finaĵon je o-finaĵo, por signi la nomon de la ago, ĉar tiamaniere estiĝus:

martel(o)-i > martel(o)-o

do en la nova vorto nenio prezentus plu la verban agan elementon. Oni devus do konservi la verbfinaĵon kaj formi

martel-i-o = martelio.

Tamen, ĉar tia amasiĝo de finaĵoj estus el pluraj kaŭzoj maloportuna, anstataŭe oni signas la elfalantan finaĵon per speciala sufiksoido: *-ad-*. La formiĝo do estos:

martel-i-o > martel-ad-o = martelado.

Oni memoru (por komparo), ke la vorton samelementan *kuri* oni povas substantivigi, por signi la nomon de la ago, per simpla ŝanĝo de finaĵo:

kur(i)-i > kur(i)-o = kuro.

Nun ni rigardu la vorton *homa*. En la esprimoj *homa konduto*, *homa kompatemo* ktp. ĝi signifas ne nur *hom-apartena*, sed signas ankaŭ ian kvaliton laŭdindan, kiun – prave aŭ malprave – oni atribuas al la homo (= *humana*). Nu, se ni volas esprimi la nomon de tiu kvalito, ni ne povas simple ŝanĝi la a-finaĵon je o-finaĵo, ĉar tiamaniere estiĝus:

hom(o)-a > hom(o)-o

do en la vorto nenio montrus plu la kvalitan elementon. Oni devus do konservi la a-finaĵon kaj formi:

hom-a-o = homao.

Tamen, ĉar oni evitas uzi plurajn finaĵojn unu apud la alia, oni signas la elfalantan a-finaĵon per speciala sufiksoido: *-ec-*. La formiĝo do estos:

hom-a-o > hom-ec-o = homeco.

Oni memoru (por komparo), ke la samelementan vorton *bela* oni povas substantivigi, por signi la nomon de la kvalito, per simpla ŝanĝo de finaĵo:

bel(a)-a > bel(a)-o = belo.

Ni vidas do, ke anstataŭ la finaĵoj elfalantaj ĉe la pluformado, se ilian sencon oni volas konservi en la nova vorto, oni uzas specialajn sufiksoidojn. Tiuj do povas esti rigardataj kvazaŭ la substantivigoj de la ne-substantivaj finaĵoj, kun la konservo de ĉi ties propra senco:

ado = i-o eco = a-o.

Tiujn sufiksoidojn (*-ad-* kaj *-ec-*) koncerne al la anstataŭataj finaĵoj (*-i* kaj *-a*) ni nomas *parelementoj*.

II. Jam ĉi tiuj ekzemploj montras, ke el **praktika vidpunkto la kategoria radik-divido estas nepre necesa**, ĉar nur per la kategorio de la radikoj oni povas rekoni, ĉu iu vorto estas samelementa aŭ malsamelementa – kaj ties rekono, aliparte, estas necesa por la scio de tio, ĉu oni ĉe la pluformado povas fari simplan ŝanĝon de finaĵo, aŭ oni devas apliki specialan sufiksoidon. Ni tuj montros pluajn ekzemplojn pri tio.

A) Ni prenu parojn da verboj kun sencoj pli-malpli parencaj: *trompi* -

ĉarlatani, kolporti - agenti, deklami - aktori, aŭguri - profeti, servi - sklavoj, kudri - tajloroj, regi - reĝoj, kaperi - piratoj, subpremi - tiranoj, viziti - gastoj, subteni - patronoj.

Nun ni ŝanĝu ilian finaĵon je -o: *trompo - ĉarlatano, kolporto - agente, deklamo - aktoro, aŭguro - profeto, servo - sklavoj, kudro - tajloroj, reĝo - reĝo, kapero - pirato, subpremo - tirano, vizito - gastoj, subteno - patronoj.*

Videble la unuaj vortoj de la paroj signifas agon, la duaj signifas personon. Tiun diferencon ne povas kaŭzi la finaĵo, ĉar ĝi estas ĉie la sama -o: ĝi devas esti entenata en la radikoj mem.

Volante, ke ambaŭ vortoj de la paroj signifas personon, ni devas formi la unuajn vortojn jene: *trompisto, kolportisto, deklamisto, aŭguristo, servisto, kudristo, registoj, kaperisto, subpremanto, vizitanto, subtenanto*, t.e. ni devas signi aparte la personon (-isto, -anto), kiun la duaj vortoj jam entenas en si mem.

Volante, ke ambaŭ vortoj de la paroj signifas nomon de ago, ni devas pluformi la duajn vortojn jene: *ĉarlatanado, agentado, aktorado, profetado, sklavado, tajlorado, reĝado, piratado, tiranado, gastado, patronado*, t.e. ni devas signi aparte la agecon aŭ statecon, kiujn la unuaj vortoj jam entenas en si mem.

B) Ni esploru plu la sekvantajn verboparojn sence parencajn: *strigli - brosi, bati - marteli, kroĉi - broĉi, veturi - kaleŝi, haki - pioĉi, kovri - koverti, porti - brankardi, aŭskulti - oreli.*

Ĉi samaj radikoj kun la o-finaĵo: *striglo - broso, bato - martelo, kroĉo - broĉo, veturo - kaleŝo, hako - pioĉo, kovro - koverto, porto - brankardo, aŭskulto - orelo* jam tre diferencas: la unuaj en ĉiu paro esprimas agon, la duaj ilon aŭ korpoparton.

Volante, ke la unuaj vortoj el la paroj signifas ilon, oni devas al ili kroĉi specialan sufiksoidon: *striglilo, batilo, kroĉilo, veturilo, hakilo, kovrilo, portilo, aŭskultilo.*

Por doni, siavice, al la duaj vortoj la signifon de ago, oni devas ilin formi jene: *brosado, martelado, broĉado, kaleŝado, pioĉado, kovertado, brankardado, orelado.*

La unuaj radikoj sekve enhavas en si mem agecon, la duaj enhavas la sencon de instrumento.

Nun ni rigardu la sekvantajn vortoparojn: *domo - konstruaĵo, letero - skribaĵo, bildo - pentraĵo, tranĉeo - fosaĵo, libro - legaĵo, parto - apartenaĵo, pulvo - eksplodaĵo, tubero - elstarado, herbo - kreskaĵo, hejmo - loĝejo, butikoj - vendejoj, trogo - trinkujo.*

Estas evidente, ke la unuaj radikoj en ĉiu paro signas ion konkretan, kaj tial ili esprimas la saman konkretajn per la sola o-finaĵo. La duaj radikoj, siavice, havas la sencon de ago, kaj doni al ili konkretecon oni devas per speciala sufiksoido. Kun la simpla o-finaĵo (*konstruo, skribo, ktp.*) ili esprimas la nomon de ago.

C) Nun ni vicigu parojn de adjektivoj similaj: *eleganta - danda,*

severa - tirana, kruela - barbara, nobla - nobela, lerta - majstra, malica - satana, kuraĝa - heroo, proksima - najbara, malsaĝa - azena, malglata - tubera, dolĉa - miela, malgranda - miniatura, intima - hejma.

Sanginte la a-finajon je o-finajo, ni ricevas la vortojn: *eleganto - dando, severo - tirano, kruelo - barbaro, noblo - nobelo, lerto - majstro, malico - satano, kuraĝo - heroo, proksimo - najbaro, malsaĝo - azeno, malglato - tubero, dolĉo - mielo, malgrando - miniaturo, intimo - hejmo.*

Jen la unuaj vortoj en ĉiu paro ĉiam signifas kvaliton, la duaj ion konkretan (personon, objekton, ideon).

Konkretsencajn vortojn el la unuaj radikoj oni ricevas jene: *elegantulo, severulo, kruelulo, noblulo, lertulo, maliculo, kuraĝulo, proksimulo, malsaĝulo, malglatafo, dolĉafo, malgrandafo, intimejo.*

La duajn vortojn, siavice, oni "kvalitigas" jene: *dandeco, tiraneco, bareco, nobleco, majstreco, sataneco, heroeo, najbareco, azeneco, tubereco, mieleco, miniaturoco, hejmeco.*

Ĉi lastaj vortoj esprimas la *nomon* de la kvalitoj esprimitaj de la ĉi-supraj substantiv-radikaj adjektivoj (*danda, tirana* ktp.).

La unuaj radikoj do enhavas sencon, kiun al la duaj radikoj donas nur substantivaj sufiksoidoj (aĵo, ejo, ulo). La unuaj, sekve, estas adjektivaj, la duaj estas substantivaj radikoj.

Rim. I. Pli longaj listoj de tiaj radikparaleloj estas troveblaj en artikolo de K. Kalocsay "Pri la vortsistemo de E-o", aperinta en "Sciencaj Komunikaĵoj", Buda-peŝto, Julio 1977.

Rim. II. Dum ĉe la 'konkretigo' oni akre distingas la suprajn adjektivo-parojn, ĉe la 'kvalitigo' oni en la praktiko iom forviŝas la diferencon per tio, ke ofte ankaŭ al la adjektivaj radikoj oni alĝuas la sufiksoidon -e c o (*eleganteco, severeco, krueleco* ktp.), evidente sub la influo de la respondaj nacilingvaj formoj (*Zierlichkeit, sévérité, cruelty* ktp.). Tamen tio ne estas nepre necesa, kaj Lanti komencis uzi tiajn sensufiksajn formojn, kiuj de tiam pli kaj pli oftigas, unuavice en la poezio, sed ankaŭ en la prozo.

III. Ĝis nun ni sufiĉe montris, ke el pure praktikaj kaŭzoj oni devas en E-o distingi inter substantivaj kaj verbaj radikoj unupartaj, kaj inter substantivaj kaj adjektivaj radikoj alipartaj. Malpli facile estas meti striktan distingon inter la verbaj kaj adjektivaj radikoj. Dum la ag-esprimaj verboj evidente diferencas de la adjektivoj (ekz-e *bati* disde *pala*), ĉe la stat-esprimaj verboj la diferenco ne ĉiam estas tiel klara (Vd. § 299, B.).

Tamen la lingvo diferencigas nete inter tiuj du kategorioj. Tion montras, ke la ĵus menciitan pleonasman - e c o oni ĝenerale ne metas post verbaj radikoj, kaj la daŭr-espriman sufikson - a d o oni apenaŭ trovas post radikoj adjektivaj.

Do la sekvantaj similsencaj adjektiv-paroj, kies unua adjektivo estas verbradika kaj la dua estas adjektivradika.

ripoza - trankvila, silenta - muta, karesa - tenera, ĝoja - gaja, svarma - abunda, ŝerca - komika, sopira - avida, ŝpara - avara fariĝas post (pleo-

nasma) substantivigo:

ripozado - *trankvileco*, *silentado* - *muteco*, *karesado* - *tenereco*, *ĝojado* - *gajeco*, *svarmado* - *abundeco*, *ŝercado* - *komikeco*, *sopirado* - *avideco*, *ŝparado* - *avareco*.

Ekzistas tamen kelkaj "hibridaj" radikoj, kiuj same akceptas ĉiun el la du sufiksoidoj: *utileco* - *utilado*, *abstrakteco* - *abstraktado*, *rapideco* - *rapidado*, *korekteco* - *korektado*, *fikseco* - *fiksado*, *komplikeco* - *komplikado*, sed, evidente, kun signifdiferenco: ne temas pri sinonimoj!

Alia diferenco inter la verbaj kaj adjektivaj radikoj estas, ke post verbaj radikoj la a-finajo ne estas pleonasma (vd. § 296, B), do ĝi povas signi ne nur kvaliton, sed ankaŭ rilaton, apartenon; tio estas absolute malebla ĉe la adjektivaj radikoj, ĉar la pleonasma a-finajo vortfare estas nulo. Do:

ama letero = letero de (pri) amo, dum *bela letero* ne estas letero pri belo;

morta lito = lito de morto, dum *malsana lito* estas lito malsana, ekz-e piedrompita;

luma mezurilo = mezurilo de lumo, dum *rapida mezurilo* estas mezurilo rapide mezuranta;

nutra komitato = komitato pri nutro, dum *sata komitato* estas komitato abunde manĝinta;

naska atesto = atesto pri nasko, dum *vera atesto* ne estas atesto pri vero.

Oni povas fari longan liston pri tiaj a-finajaj verb-radikoj uzataj por signi la ideon -rilata, -apartena: *asekura kontrakto*, *malarma konferenco*, *blova instrumento*, *bora truo*, *hereda bieno*, *manĝa karto*, *naĝa kapablo*, *prezida seĝo*, *raza ŝapo* ktp. Tamen, ofte la kvalita senco tiom superregas en tiaj formaĵoj, ke tio malebligas la rilat-sencan uzon: *konsterna*, *konfuza* aŭ *flua raporto* ekz-e nepre ne vekas la sencan de raporto pri konsterno, konfuzo aŭ fluo, nek *maĉa* aŭ *vaga doloro* tiun de doloro ĉe maĉo aŭ vago. La uzebleco de la rilat-apartena senco do dependas de la naturo de la verbradiko, sed krome ankaŭ de la epitetita substantivo: *maĉa daŭro* aŭ *vaga vojo*, ekz-e, jam estas kompreneblaj kiel daŭro de maĉo aŭ vojo de vago.

Baze de ĉio ĝisnuna, oni povas eldiri, ke la E-aj radikoj ne estas nur senkarakteraj stumpoj, sed ili havas jam en si mem klare kaj precize difinitan sencan kaj karakteron, kiuj decide influas ilian konduton ĉe la finaĵa pluformado. La regulojn pri tio ni ripetos ankoraŭ koncize en la Resumo (§ 286).

HISTORIO KAJ PRAVIGO DE LA KATEGORIA DIVIDO

284

Konsiderante, kiel zorge Zamenhof, en la Fundamenta Vortaro, atentis, ke li ĝuste difinu la karakteron de la radikoj per la vortkaraktero de la nacilingvaj tradukvortoj, kaj rememorante pri la regulo, ke "la finiĝoj

estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj” (Fundamenta Gramatiko, § 11), oni povas diri, ke la kategoria divido kaj la finaĵa formado de la vortoj estas ne nur Zamenhofaj, sed ankaŭ Fundamentaj, do netuŝblaj.

La sistemo, tamen, estis nur praktikata, sed ne formulita. Nur post 1908, kiam L. Couturat faris, baze de la logistiko, sian novan vortfaran sistemon, la sistemon de Ido, la esp-istoj komencis okupiĝi pri la teoria flanko de sia lingvo. Oni devis pruvi, ke la vortfarado de la lingvo, montriĝinta tiel taŭga en la praktiko, ne povas esti tiel ĥaosa, kiel tion ŝajnigas la idistoj. Aliflanke oni kritikis ankaŭ la sistemon de Ido, pruvante ties pezecon kaj ties malfidelecon al siaj propraj principoj.

La unua, kiu formulis la kategorian dividon, estis Emile Boirac en la Antaŭparolo de sia *Plena Vortaro*. Tie li skribas: ”Estus facile montri, ke la radikoj de *Universala Vortaro* regule dispartiĝas en diversajn kategoriojn, t.e. verbajn, substantivajn, adjektivajn ktp., kiel oni povas konstati per la diversnaciaj tradukoj de ĉiu el ili, kaj kiel cetere postulas la naturo mem de la realaĵoj kaj de la homa penso”. Oni trovas signojn en tiu artikolo, ke Boirac havis bonan konjekton pri la ag-esprima signifo de *-ad-* kaj pri la kvalit-esprima signifo de *-ec-*.

En la sama jaro (1909) publikigis G. Kolowrat sian sistemon: li konstruis ĝin sur la bazo de la senkaraktereco de la radikoj. En 12-paĝa broŝuro li iom detale ellaboris la sistemon, sed ĉi tiu necesigas formojn neniam uzatajn en E-o: *helpo* (= helpanto), *leviĝi* (= leviĝi), *skribeco* (= skribado), *urbala* (= urba). Kompreneble, ellaborinte sistemon fremdan al E-o, Kolowrat devis elricevi formojn fremdajn al nia lingvouzo. Tamen, li estis ”fidelulo” ne volonta reformojn, li volis ataki nur la derivsistemon de Ido, precipe ties duopan radik-dividon. El tiu ĉi embaraso li liberigis sin tiel, ke li *permesis* la komunuzajn formojn, neregulajn laŭ liaj postulaĵoj. Nu, sistemo, laŭ kiu la tuta lingvo konsistas el permesataj pekoj, certe ne povas esti la valida regularo de tiu lingvo.

Höveler, pli konata sub lia pseŭdonomo Ĉefeĉ, la patro de la famaj lingvo-ŝlosiloj, akceptis duopan radikdividon: laŭ li ekzistas radikoj konkretaj kaj abstraktaj. Sed li ne ellaboris sian sistemon detale. Kaj, se oni komplete ellaborus ĝin, oni venus al la derivsistemo de Ido, kiu same baziĝas sur duopa divido (radikoj verbaj kaj neverbaj).

En la sama tempo René de Saussure klare kaj detale ellaboris la sistemon de la triopa radikdivido kaj finaĵa pluformado (en 92-paĝa broŝuro franclingva *La construction logique des mots en Esperanto*, 1910, kiun li subskribis per sia pseŭdonomo Antido). Zamenhof skribis pri tiu laboro al Saussure: ”La lastan verkon mi legis kun granda intereso; mi trovas ĝin *bonega*. Laŭ mia opinio estus tre utile, se vi eldonus ĝin ankaŭ en Esperanto, por ke ĉiu esperantisto, precipe la verkantoj, atente ĝin tralegu kaj por ke ili penu observi tiujn principojn, kiujn vi bonege esploris kaj klarigis. Mi ne dubas, ke nia Akademio tre volonte donos al via propono sian oficialan aprobon...” (O.V. pĝ 455). Zamenhof do parolas pri esploro kaj klarigo de principoj; sed esplori kaj klarigi oni povas nur

ion ekzistantan, sekve la Saussure-aj konstataĵoj – laŭ Zamenhof mem – ekzistas en E-o, eĉ, estas liaj propraj principoj.

Pruve, Zamenhof en 1907 (do antaŭ la apero de la Saussure-a ellabor-aĵo) skribis al Cart, ke por *stuk*, same kiel por *stamp*, li ”intencis doni al la radiko signifon verban” (O.V. pĝ. 539). Do verban signifon, t.e. verban karakteron li atribuis al *nudaj* radikoj.

En 1911 Saussure prezentis sian sistemon al la Akademio kaj ĉi tiu aranĝis enketon pri la temo. Malgraŭ ke la plimulto trovis la sistemon tre racia, konsekvenca kaj simetria, la Akademio ĝin ne akceptis (parte pro la opozicio de Ĉefeĉ kaj Nylén, parte pro la negativa sinteno de Cart, parte pro la kompromisaj iniciativoj de Saussure en la Ido-milito); ĝi, kaj poste la Lingva Komitato, akceptis nur la principojn de la Neceso kaj Sufiĉo (vd. § 285). Ni vidos, ke tio ne estis logika, ĉar sen la kompleta sistemo tiuj principoj ne havas sencon.

De tiam la Saussure-a sistemo estis plurfoje atakata, sed ĉiuj, kiuj detale okupiĝis pri la E-a vortfarado, esplorante ĝin en ĉiuj ties detaloj (Wüster, Minor, Rollet de Lisle, Isbrucker, Neergaard, de Hoog ktp.) trovis ĝin konforma al la lingvouzo, eĉ la sola sistemo aplikebla al nia lingvo. Kaj en la nuna lingvo bone montriĝas la pliklariga, plifleksebliga influo de la sistemo, kiu, kiel ĉiu bona teorio, havas ne nur idean, sed ankaŭ praktikan, evoluigan signifon. Sendube, la nuna lingvo ankoraŭ pli konformas al la sistemo, ol la liatempa.

Kiel estas eble, ke oni tamen rifuzis kaj provis refuti ĉi tiun sistemon?

Ni konsideru la kontraŭargumentojn:

1. La unua kontraŭdiro baziĝas sur simpla miskompreno. Ĝi argumentas per tio, ke el ĉia radiko oni povas formi ĉiakarakterajn vortojn. Sed la sistemo tion ne kontraŭas; male, ĝi baziĝas ĝuste sur tio ĉi. Ekz-e Nylén (en *Sonoj kaj vortoj en E-o*) diras, ke la radiko *tajlor* funkcias substantive en *tajloro* kaj verbe en *tajlori*. Nu, en *tajlori* ne la radiko *tajlor* funkcias verbe, sed ja la finaĵo *-i*: se tiu ĉi elfalas, tuj ĉesas la verba funkcio. Se ne tiel estus, *tajloro* povus signifi jen personon, jen agon, kaj estas evidente, ke ĉi lastan signifon ĝi neniam havas: por ĝin signi, oni devas diri *tajlorado*, do oni devas aldoni al la radiko la signon de la verba funkcio. Kaj kial oni devas ĝin aldoni? Ĉar la radiko mem, estante substantiva, ĝin ja ne havas.

Lastatempe Gill rompis lancon por la sendivideco t.e. plurkaraktereco de la radikoj. Li – laŭ R. Rossetti – diris proksimume: ”*hok* signas (a) konkretaĵon kun (b) certa formo kaj (c) servantan por certa uzo, *hoko* akcentas la konkretan esencon de la radiko, *hoka* la formon kaj *hoki* la uzon, la funkcion”. – Jes, sed kio pri *hak*? La afero tute ŝanĝiĝas: *hako* signifas uzon, funkcion, kaj la konkretan sencon oni devas esprimi per *hakilo*. Do – la ŝanĝo de unu vokalo renversis la tutan teorion!

R. Rossetti proponas kompromison: ”A) La E-aj radikoj latente posedas plurajn gramatikajn karakterojn laŭ la asocioj de la radik-ideo. B) Ĉe la

pliparto de la radikoj unu gramatika karaktero estas ĉefa kaj fariĝas elirpunkto por la ceteraj. C) Kelkaj radikoj estas pli-malpli neŭtralaj; ilin la vortaristoj arbitre asignas al unu aŭ alia kategorio”.

Tio estas tre lerta provo de kompromiso; sed nenia kompromiso ŝajnas ebla ĉi tie. Ni ekprenu la suprajn tri punktojn: Pri A.: se tiu latentata plurkaraktereco de la radikoj signifas tezon identan kun tiu de Panel-Nylén-Gill, tiam ĝi — kiel ni abunde pruvis ĝis nun — estas simpla eraro aŭ miskompreno; kaj se ĝi signifas nur tion, ke teorie el ĉiakaraktara *radiko* oni povas finaĵe pluformi ĉia-ajn-karakteran *vorton*, tiam ĝi konfirmas la Saussure-an sistemon, sed en tre miskomprenbla maniero. — Pri B.: ŝajnas erariga paroli pri ”ĉefa karaktero”, ĉar tio supozigas, ke ekzistas karakteroj malĉefaj, okaze ankaŭ validiĝantaj. Sed R. Rossetti certe ne validigus en sia prozo tiajn malĉefajn karakterojn kaj ne rakontus: ”*Vizitis min kolporto de komboj*”, dum li senhezite dirus tion pri ”*agente de brosoj*” aŭ pri ”*kolportisto de kombiloj*”. — Pri C.: vortarista protesto pri la ”arbitra asigno” ne estas lokapartena en gramatiko; cetere tiu ”asigno” ne interesas la teorion de la vortfarado: ĉi tiu ja eksplikas fenomenojn *postajn* al la difinado de la kategorio, kaj ne okupiĝas pri tiu difinado mem (Kp. § 435, Rim. II.).

2. Stojan postulis pli detalan klasifikon: laŭ li la substantivojn oni distingu laŭ sencoj *individuaj* (ekz-e: homo, reĝo, tajloro), *instrumentaj* (martelo, broso), *lokaj* (domo, hejmo), *materialaj* (oro, metalo), *ideaj* (scienco, gramatiko, tabuo), *bestaj* (hundo, azeno), *kreskafaj* (kverko, herbo) ktp. Sed tiuj diferencoj estas sencaj, kaj ne gramatikaj. El gramatika vidpunkto, por *pure praktikaj celoj*, estas seninteresa la lingvo-filozofia klasado de la nomoj, gravas nur ilia konduto ĉe la pluformado. Kaj ĉar la suprakategoriaj radikoj unuece formas la nomon de ago per *-ado* (ekz-e: reĝado, martelado, orado), la nomon de kvalito per *-eco* (reĝeco, hejmeco, metaleco), kaj per la sola o-finaĵo neniam povas signi la nomon de ago (kiel faras la radikoj verbaj), nek la nomon de abstrakta kvalito (kiel ja la radikoj adjektivaj), oni povas ilin, *pure gramatike*, klasi en unu grupon kaj nomi ilin per la zamenhofa termino *substantivaj*.

Cetere, ankaŭ pri la verboj oni povus fari tian dividon: *profesiaj* (ekz-e: regi, prezidi), *laboraj* (haki, segi), *sensaj* (aŭdi, flari), *spiritkonstruaj* (pensi, revii), *kreaĵaj* (fari, produkti, konstrui) ktp. ktp. Krome, ni jam menciis, ke ili dividiĝas en verbojn *agajn* (fari, konstrui, haki, skribi) kaj en verbojn *statajn* (kuŝi, ripozi, silenti, lumi). Tamen, el pure vortfara vidpunkto, ĉiuj apartenas al la sama kategorio, ĉar kun la o-finaĵo ili signas agon aŭ staton, kun *-ado* daŭron aŭ ripeton. Komprenoble, ili diferencas ankaŭ laŭ transitiveco aŭ netransitiveco, sed tio ne rilatas al la finaĵa aŭ parelementa pluformado.

3. Jam en la Akademia enketo (en 1911) oni kontraŭmetis, ke la sistemo ne tute respondas al la lingvouzo, ĉar ĉi tiu uzas formojn (ekz-e fiereco, dormemeco, libereco ktp.), kiuj laŭ la sistemo devus esti sen

-eco (fiero, dormemo, libero). Tamen, tio ne refutas la sistemon: la mallongaj formoj ja ekzistas (jam en tiu tempo Zamenhof skribis: *malsprita fiero; pli bona pano sen butero, ol kuko sen libero*), kaj kun la tempo ili eĉ pli- kaj plioftiĝis en la lingvo. Post -em-, ekz-e, oni jam, nuntempe, apenaŭ uzas -eco.

4. Oni povus kontraŭdiri, ke kelkaj verbo-substantivoj (ekz-e: konstruoj, skribo) povas signi ankaŭ *konkretajon*, agrezulton, do ne la *nomon de la ago*, kiel tion postulus la sistemo. Tamen, ĉi tie temas pri alia afero, pri la senca elasteco de la finaĵoj (vd. § 286). Aliajn ŝajnajn nekonformaĵojn (ekz-e: senforta, senpova) komprenebligas kaj pravigas la inversa vortefiko (vd. § 304).

5. Multaj adeptoj de la simplismo malamikis al la sistemo pro tio, ĉar ili timis, ke per ĝi oni konfesos la malfacilecon de la lingvo: oni devas ja lerni el la vortaro la diversajn radikkarakterojn. Oni povus diri je tio, ke, se la sistemo estas valida, temas ne pri elekto, sed pri konstato – kaj konstati ion faktan ne povas esti malaprobekbla afero. Cetere tiu malfacileco ne estas troiginda: ĉe la plej granda parto de la radikoj ja estas evidente je la unua vido, al kiu kategorio ili apartenas. Ĉe tiuj malmultaj, tamen, kies kategorio estas ne tuj konstatebla, oni devas fakte rigardi la vortaron, se oni volas ilin ĝuste uzi. Sed ĝuste tion oni devas fari ĉiaokaze, eĉ en ignorado de ĉia sistemo, se nur oni volas uzi la lingvon korekte, t.e. kiel ĉiuj aliaj esperantistoj.

6. En la 1911-a-jara enketo, akademiano Ellis esprimis la unua tiun opinion, ke la gramatika karaktero en la Universala Vortaro estas nur ŝajna, kaj devenas de tio, ke la naciaj vortoj, per kiuj la U.V. tradukas tiujn vortradikojn, havas neeviteble tian karakteron. Ĉi tiu argumento havis longan vivon, vivis ĝis la lastaj tempoj (Panel, Nylén kaj aliaj). Kontraŭargumentojn la leganto abunde trovos en la ĝisnunaj pritraktadoj de la temo; ni aldonu ankoraŭ, ke unu el ni, en aparta broŝuro (*La gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj*, Budapest 1938), refutis tiun kontraŭdiron, pruvante, ke oni tute ne povas difini la E-ajn radikojn sen la markado de la radikkarakteroj: ĉi tiuj, ankaŭ en vortaro Esperanta-Esperanta, nepre ekzistas kaŝe en la difinoj, aŭ – la vortaro estas sen praktika valoro, ĉar ĝia uzanto ne kapablus scii, ĉu li diru aŭ ne: "Tiu kudro laboras malbone, li tute fuŝis la tajloron de mia vesto".

Estas do ĝojinde, ke tiu ĉi sistemo, kiun neniu refutis kaj eĉ malpli povis anstataŭigi ĝis nun, post preskaŭa duonjarcento estis oficiale agnoskita de la Akademio en Majo 1967.

NECESO KAJ SUFIĈO

285

La principo de Necesito kaj Sufiĉo, starigita de Saussure, estas oficiale akceptita de la Akademio kiel "la logika bazo de la vortfarado en Esperanto". Ĝia plena teksto estas:

”1. La Akademio opinias, ke la vortfarado en Esperanto estas fondita sur la logika kaj senpera konstruo de ĉiu aparta vorto, kaj ne sur tiel nomataj ”reguloj de derivado”; ke reguloj de derivado malutilis al la lingvo, agante kontraŭ ĝia normala funkciado; ke tiaj reguloj alportus arbitrajn elementojn, ĝenantajn por la skriba lingvo kaj malutilajn por la parola lingvo.

2. La Akademio opinias, ke kelkaj aŭtoroj trouzas sufiksojn; tio estas preskaŭ neevitebla en la parolata lingvo, sed igas la skribatan lingvon nenecese peza. La kaŭzo de tiu trouzo kuŝas en la fakto, ke nevole oni ofte tro insistas sur ĉiu esprimota ideo, por ĝin penetrigi pli forte en la spiriton de l’ aŭskultanto aŭ de l’ leganto. Ĉar, aliflanke, oni ne devas tiom ŝparegi la sufiksojn, ke la vortoj fariĝu nekompreneblaj, estas konsilinde difini la limojn, inter kiuj oni devas resti, tiamaniere ke oni lasos al arbitro kaj personaj preferoj rolon kiel eble plej malgrandan.

La Akademio do rekomendas al esperantistaj aŭtoroj, ke ili sekvu la du jenajn principojn, kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj estas la logika bazo de la vortfarado en Esperanto:

a) *Principo de neceso*: en konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto;

b) *Principo de sufiĉo*: se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzataj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa”.

(*Oficiala Gazeto Esperantista*, 1912-13, pĝ. 208).

La tuton de la Saussure-a sistemo la Akademio rifuzis.* Tamen, en la principoj de la Neceso kaj Sufiĉo, kaŝe jam enestas ties akcepto. Nur per la karaktero de la radiko oni ja povas ekscii, kiajn aliajn elementojn oni devas alglui, por elvoki la reprezentotan ideon. Kaj sen la scio de la radikkarakteroj oni ankaŭ ne povas ĝuste ŝpari pri la sufiksoj, ĉar oni ne povas prijuĝi, ĉu certajn elementojn entenas la radiko aŭ oni devas ilin marki per sufikso.

Krome, pro la aludo al la kunteksto, kiun oni alprenis laŭ la propono de Höveler, la teksto estas ankaŭ erariga, kontraŭa al la reganta lingvo-

* Tio cetere ne senkuraĝigis de Saussure: kiel Prezidanto de la Komisiono pri Vortfarado, li en 1915 prezentis al la Akademio novan raporton, titolitan *Fundamentaj Reguloj de la Vortfarado en Esperanto*, kiun li antaŭe submetis al D-ro Zamenhof. Ĉi tiu respondis al li, la 8.V.1915: ”Quant à vos Fundamentaj Reguloj de la Vortteorio, je peux vous dire que je n’y trouve rien qu’on puisse désapprouver. J’estime que l’Académie peut donner son approbation à votre livre”. (t.e. ”Koncerne viajn ’Fundamentaj ktp.’ mi povas diri al vi, ke en ĝi mi trovas nenion, kion oni povus malaprobi. Mi opinias, ke la Akademio povas doni sian aprobon al via broŝuro”). Malgraŭ tio, la Akademio ne plu okupiĝis pri tiu raporto ĝis 1966.

kutimo. Estas erare, ke oni povas pravigi, precipe en prozo, ĉiun formon, kiu estas komprenebla helpe de la kunteksto. Tiaj kompreneblaj frazoj estus ekz-e: "li aĉetis *kombon* el eburo" aŭ "dum *martelo* li vundis sian fingron" aŭ ankaŭ "ŝi *puris* la makulitan veston per sapo". Certe oni ne povas diri neutilaj kaj nenecesaj en la supraj kursivaj vortoj la sufiksoidojn *-il*, *-ad* kaj *-ig*.

Mallonge oni povus jene prezenti la principon:

"En la konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, afiksojn kaj finaĵojn, kiuj *necesas*, sed ne pli ol kiom *sufiĉas* por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan.

Noto. Por elvoki la ideon reprezentotan oni povas sin helpi ankaŭ per la kunteksto, *inter certaj limoj*, uzante la sencan elastecon de la finaĵa pluformado".

LA SENCA ELASTEKO DE LA FINAĴOJ

286

Ni jam okupiĝis (vd. § 280) pri la propra senco de la finaĵoj, sed tiam ni difinis nur ilian rigidan sencan. Ankaŭ en la ĝisnuna pritraktado ni uzis la finaĵojn nur laŭ ilia senco rigida.

Sed en la fino de la antaŭa paragrafo estas menciita la senca elasteco de la finaĵa pluformado kaj ankaŭ tio, ke ĝi havas certajn limojn. Ni esploru do tiun elastecon de senco.

I. La o-finaĵo, kiel dirite, havas la signifon "kio estas, ekzistas". Ĉar la ekzistaĵoj estas objektoj, ideoj aŭ okazaĵoj, kaj ĉar rigardate en si mem kiel konceptoj, se ili estas eldiritaj, ili estas ankaŭ nomitaj, la o-finaĵo ĉiam montras la *nomon* de io (konkretaĵo, ideo, kvalito, ago-stato).

a) Ĉe la substantivaj radikoj, kiuj jam mem enhavas tiun noman signifon, la finaĵo estas pleonasma, *dom* estas jam en si mem la nomo de konkretaĵo, do tio sama kiel *domo*. Simile: *homo*, *gramatiko*, *scienco*.

b) La adjektivaj radikoj havas la signifon de karakterizo, do ili ĉiam apartenas al ia objekto aŭ ideo, tiun karakterizante. La o-finaĵo kvazaŭ liberigas ilin el tiu dependeco kaj nomas ilin absolute, sendepende de la karakterizata aĵo. Tiu absoluta senco povas esti kvarspeca:

1) abstrakta koncepto: *la bono*, *la belo*, *la utilo*;

2) ies kvalito en si mem: *la belo* (de virino), *la bono* (de konsilo), *la utilo* (de ago). Ĉi-sence, tamen, la lingvo plejofte ne kontentas pri la simpla o-finaĵo, sed almetas la sufiksoidon *-eco* (beleco, boneco, util-eco), do ĝi distingas inter la abstrakta koncepto kaj la karakteriza kvalito;

3) konkreta manifestiĝo de kvalito: *la beloj* (de pejzaĝo), *la malglatoj* (de vojo), *la malfaciloj* (de tasko): *Dio*, *leviĝu super la furiozon de miaj premantoj*². Ĉi-sence, la lingvo plejofte uzas la sufiksoidon *-aĵo*, (bel-aĵoj, malglataĵoj, malfacilaĵoj);

4) individua manifestiĝo de kvalito, do persono, kies esenca trajto estas la respektiva kvalito: *belo*, *karo*. Ĉi tiun eblon, tamen, la lingvo uzas tre malofte kaj tiaokaze preferas la uzon de la sufiksoido *-ulo* (belulo, karulo).

Rim. I. Kiel oni vidas, la sistemo permesas unuflanke tian ekstreman elastecon, kian la lingvo eĉ ne uzas (estis do plene senmotive akuzi ĝin per "idista rigideco"); aliflanke ĝi ebligas plej precize distingi inter abstrakto, kvalito kaj konkreta manifestiĝo. Sed ni vidas ankaŭ, ke post substantivaj radikoj la o-finaĵo estas pleonasma, do kiel vortfarilo ĝi estas nula. Tial la konkreta senco de ĉi tiuj formaĵoj estas absoluta, rigida: *martelo* neniaokaze, eĉ ne helpe de kunteksto, povas signifi agon, *homo* neniaokaze povas signifi kvaliton.

c) Ĉe verbaj radikoj la o-finaĵo signas unuavice:

- 1) la nomon de ago: *bato* (la ago bati), *skribo* (la ago skribi);
- 2) sed ĝi povas per sia senco "kio estas, ekzistas" ankaŭ "ideigi" la esprimon, signante tiel ne aktualan agon, sed kvazaŭ abstraktan koncepton: *amo*, *danco*, *kulturo*. La nomon de la aktuala ago oni esprimas tiaokaze per -ado: *amado*, *dancado*, *kulturado*;
- 3) fine, per sia "ekzista", konkretiga senco, ĝi povas signi ankaŭ la konkretan manifestiĝon (ekz-e rezulton) de la ago (*konstruo*, *skribo*, *havo* anstataŭ *konstruaĵo*, *skribaĵo*, *havaĵo*), do ĝi povas anstataŭi la sufiksoidon -aĵo preskaŭ laŭ ties ĉiuj sencoj (vd. § 328, 2.). Ĝenerale, tamen, oni uzas la plenajn formojn kun -aĵo. Neniam ĝi povas anstataŭi la sufiksoidon -ilo (*kombilo*).

Oni do povas diri, ke la o-finaĵo povas a) simple signi la nomon, b) ideigi, c) konkretigi. Tio permesas en la lingvo uzi mallongajn "resumajn" formojn, sin bazante sur la kunteksto.

II. La a-finaĵo signas la adjektivecon, t.e. la karakterizan funkcion: tion, ke la respektiva koncepto ne estas memstara, sed servas por ies determino.

a) Ĉe la substantivaj kaj verbaj radikoj la a-finaĵo povas havi tri specojn de determino:

- 1) identecon: *reĝa persono* (persono, kiu estas reĝo), *ama sento* (sento, kiu estas amo);
- 2) kvaliton: *reĝa sinteno* (sinteno reĝkvalita), *ama koro* (koro amkvalita);
- 3) rilaton aŭ apartenecon: *reĝa palaco* (palaco apartenanta al reĝo), *ama letero* (letero rilata al amo).

Tio estas plene logika, ĉar la a-finaĵo signas sole la dependecon, la determinan funkcion, do povas montri ĉiujn eblajn specojn de tiu determino (identecon, kvaliton, rilaton).

b) Ĉe la adjektivaj radikoj la a-finaĵo estas pleonasma, do vortfare nula. Tial ĝi povas doni nenian alian sencon al la kvalitsenca radikoj: nek identeco, nek rilato estas per ĝi esprimebla. Efektive "*bela kvalito*" neniam signifas "kvalito, kiu estas belo", nek "*bela letero*" signifas "letero rilata al belo", sed *bela* ĉiam montras nur unun el la ecoj de tiu kvalito aŭ letero. Pli detale, vd. ankoraŭ § 296.

III. La verbaj finaĵoj havas la sencon, kiun ni donis jam en la § 280. Post adjektivaj kaj substantivaj radikoj ilia signifo estas: agi aŭ stati karakterizate de la radiksenco. Post verbaj radikoj ili estas pleonasmaj, do rigi-

daj, povantaj doni nenian senco-pluon. Ekz-e ili ne povas ŝanĝi la transitivecon de la verbradiko: *fini* neniam signifas *finiĝi*, nek *bruli* signifas *bruliĝi*.

Rim. II. La o-finaĵo kaj a-finaĵo, kiuj post verbradikoj ne estas pleonasmaj, havas tie pli grandan elastecon: *skribo*, *murdo*, *nasko* povas signi same aktivan agon (skribo de infano), kiel pasivan (skribo de letero); kelkaj transitivradikaj verbo-adjektivoj estas uzataj same en aktiva kiel en pasiva senco: *fiksa*, *abstrakta*, *konfuzo*, *korekta*, *ĉagrena* (*ĉagrena okazajo* kaj *ĉagrena koro*).

Tamen ankaŭ post adjektivaj radikoj la verbfinaĵoj signifas ĉiam nur staton, neniam venon aŭ venigon en staton: *puri* estas nur "stati pure", neniam "purigi" aŭ "purigi".

Jen estas do tiuj limoj de elasteco, laŭ kiuj oni povas pli-malpli aŭdace ellasi sufiksojn kaj sin konfidi al la klariga kapablo de la kunteksto. Vd. ankoraŭ §§ 331 kaj 435, Rim. II.

IV. Resumo. La E-a vortfarado konsistas simple en la apudmeto de memstaraj elementoj. Specialaj derivreguloj ne ekzistas, la senco de la unuopaj elementoj en la kunmeto restas sensanĝa. Por ricevi vorton kun certa senco, oni kunmetas la elementojn necesajn kaj sufiĉajn por elvoki la sencon deziratan. El la elementoj aldoneblaj oni aplikas unuavice la finaĵojn. Specialajn sufiksoidojn oni aplikas nur, se la sencon oni ne povas doni per finaĵo. Ĉu la respektiva senco estas donebla per finaĵo aŭ por tio necesas sufiksoidoj, tion montras la senco kaj la gramatika karaktero de la radiko.

Pluformante vortojn, en kiuj la finaĵoj havas funkcion de sufikso, oni devas zorgi pri tio, ke la finaĵo ne perdiĝu sen anstataŭiĝo. Anstataŭ la kvalita a-finaĵo oni aplikas la sufiksoidon *-ec*, kiu estas nomebla substantivigita kvalita *a* (a-o). Anstataŭ la verba finaĵo oni aplikas la sufiksoidon *-ad*, kiun oni povas nomi substantivigita verba finaĵo (i-o).

La Esperanta vortfarado do baziĝas sur la *rekta* konstruo de ĉiu aparta vorto, el la baza radiko kaj aldonitaj elementoj. Siavice, per la forigo de la almetitaj elementoj, oni revenas al la origina radiko, do la "renversebleco" (vd. § 435, A.) estas perfekta:

homo - *homa* (homkvalita) - (homao) *homeco* - *homeca* (homa) - *homo*.

martelo - *marteli* (martelagi) - (martelio) *martelado* - *marteladi* - *marteli* - *martelo*.

Ĉar ĉiuj elementoj (radikoj, afiksoidoj, finaĵoj) estas memstaraj vortoj, kuniĝantaj sen specialaj derivreguloj, nur kun sia propra senco, estas evidente, ke, anstataŭ specialaj vortfaraj aŭ derivaj reguloj, ni devas serĉi la regulojn de la E-a vortkunmeto. Tiuj devas validi ankaŭ pri afiksoidoj kaj finaĵoj.

II. LA KUNMETADO

1. LA LEĜOJ DE LA KUNMETADO

Ni dividos la studon pri la vortkunmeto en tri partojn.

Unue ni formulos la **leĝojn** de la kunmetado; due, ni klarigos tiujn leĝojn per duobla ekzempla **demonstrado**, analizante kaj sintezante; trie ni pritraktos detale la specialaĵojn de tiuj elementoj, kiujn ni nomis **afiksoidoj**.

Ni esploros la kunmet-regulojn komence ĉe la *duelementaj*, poste ĉe la *trielementaj* vortkunmetoj kaj fine ĉe tiuj, kiuj konsistas el *pli ol tri* elementoj. Sekvos studo de la demando pri la *konservo de la finaĵoj* inter la elementoj de la kunmetoj. Fine ni mencias kelkajn *esceptojn* kaj ni aldonos *resumon* pri la tuta sistemo.

287

A. DUELEMENTAJ KUNMETOJ

ĜENERALAJ REGULOJ

288

La Esperanta vortkunmeto obeas certajn ĝeneralajn regulojn, rekonoblajn el la esploro de la kunmetitaj vortoj.

1. En vortkunmetado la ĉefa vorto staras en la fino kaj fiksas la gramatikan vortkarakteron kaj la ĉefan sencion de la kunmetita vorto. Ĝi estas la *ĉefelemento*. La antaŭaj elementoj servas nur por karakterizo de la ĉefelemento, tiuj estas la *flankelementoj*.

Ekzemple en *dormo-ĉambro* la ĉefelemento estas *ĉambro*, ĝi markas la gramatikan vortkarakteron (substantivo) kaj la sencion ĉefan (ejo). La flankelemento *dormo* servas por karakterizo, montrante, ke la ĉambron oni uzas por dormado.

2. La finaĵoj, se ili estas pleonasmaj, estas neglekteblaj el la vidpunkto de la vortkunmeto, do tiaokaze la ĉefelemento estas la radiko antaŭfinaĵa. Sed la finaĵoj proprafunkciaj estas rigardataj kiel memstaraj vortoj, do *la proprafunkcia finaĵo mem estas la ĉefelemento*, kaj la antaŭfinaĵa radiko estas nur flankelemento.

Ekzemplo: en *marteli* la ĉefelemento estas la i-finaĵo, havanta propran sencion (agi). La radiko *martel* estas flankelemento, montranta, ke la ago okazas per martelo.

Rim. Escepton el la 1. regulo ni trovas ĉe la tri sufiksoj veraj: *et*, *eg* kaj *aĉ* (*diafanaj* sufiksoj). Vd. § 408 k.s.

REGULOJ DE VORTEFIKO

289

La ĉefelemento fiksas per sia gramatika karaktero ne nur la sencion de la vorto, sed ankaŭ la gramatikan karakteron de la flankelementoj. Ĝi do efikas sur ilin, povante al ili doni tian vortkarakteron, kian, per sia radikkaraktero, ili ne havas.

Esplorante ĉi-rilate la Esperantan lingvouzon, ni povas el ĝi tiri la jenajn regulojn.

I. Substantiva ĉefelemento substantivigas la antaŭan flankelementon.

II. Adjektiva ĉefelemento substantivigas la antaŭan flankelementon.

III. Verba ĉefelemento povas efiki al sia flankelemento dumaniere

1. per adverbigo

2. per adjektivigo, farante ĝin, laŭ la senco, sia predikata adjektivo.

Rim. I. Tiujn vortefikojn (de dekstre al maldekstre) ni nomas *vortefiko rekta*, por distingi de la vortefiko inversa (vd. § 304).

Rim. II. Kelkaj, laste ankaŭ de Hoog, volus ĉe VER. III., ankaŭ trian punkton, ke nome la verba ĉefelemento faras la flankelementon sia agobjekto. Sed la leĝigo de tia analizo ne ŝajnas konsilinda (vd. § 305, Rim.).

Rim. III. Ne obeas al la supraj reguloj la veraj afiksoj kaj kelkaj malmultaj radikoj "prefiksigeblaj". Vidu § 408 k.s.

NB. Por mallongo ni signos la suprajn regulojn per: VER. I, VER. II, VER. III. 1., kaj VER. III. 2.

Sintakso kaj Sintezo

290

Kiel rimarkeble el la supraj reguloj kaj avizate jam en la enkonduko, E-o nete distingas inter *sintakso* (frazkonstruo), per kiu oni esprimas ion helpe de pluraj memstaraj vortoj, kaj *sintezo* (vortfarado, vortkonstruo), kiu esprimas ion per elementoj kunfanditaj en unu pli-malpli kompleksan vorton. Ĉi tiujn du manierojn de esprimo ne regas tute la samaj reguloj. La diferencoj estas jenaj:

1. La vortordo en la du okazoj estas inversa. Do, se oni analizas (dismetas) kunmetitan vorton, oni ŝanĝas la vicordon de ĝiaj elementoj (*homkapo* > kapo de homo; *prespreta* > preta je preso; *purigi* > igi pura). Tio sekvas el la Fundamenta regulo, ke "la ĉefa vorto staras en la fino", ĉar tiamaniere la flankelemento estas ordinare la suplemento de tiu "ĉefa vorto", do ĉe la dismeto ĝi devas stari *post* ĉi tiu. Tiel klariĝas, ke ĉe la vortfarado la 'inversa vortefiko' (de maldekstre dekstren) havas la saman direkton kiel la *normala* vortordo ĉe la frazo. Vd. § 304.

2. La gramatikaj finaĵoj inter la elementoj estas forigitaj, se ilian konservon ne postulas la prononceblo aŭ aliaj konsideroj (vd. § 309).

3. Ne ĉiuj sintakse interrilatantaj elementoj povas sinteziĝi en vorton. La komplementoj rektaj, t.e. senprepoziciaj ĝenerale staras aparte kaj ne toleras kunmeton (*aĉeti libron*, *blua okulo* ne kunmetiĝas je *libraĉeti* aŭ *bluokulo*); ĉi tiu principo validas eĉ pri la VER. III, 1., ĉar antaŭ verba ĉefelemento adverba flankelemento estas metata ordinare nur tiam, kiam ĝi ne havas adjektivan radikkarakteron: *ekz-e diligente lerni*, *bele skribi*, *precize veni* ne estas kunfandebaj. Ordinare la komplementoj nerektaj, t.e. prepozitivaj estas tiuj, kiuj, inter certaj limoj (vd. § 134), povas sinteziĝi kun sia determinato: *domo de urbo* > *urbodomo*, *avida je sango* > *sangavida*, *murdi per pafado* > *pafmurdi*, *bati per martelo* > *martelbati*. Kiel oni vidas, la flankelementoj de la verba ĉefelemento povas esti analizataj ankaŭ per prepozitivo anstataŭ adverbo (*murdi pafe*, *bati marteles*). Efektive, oni povus diri, ke laŭ VER. III, 1. ankaŭ la verba ĉefelemento postulas substantivan flankelementon, sed ĉi tiu funkcias ĉiam kiel instrument-adjekto, do estas esprimebla per la e-finaĵo (*martele*, *pafe*).

Baze de tiu punkto 3. oni preskaŭ povas starigi la regulon, ke la flank-elemento en la kunmetoj estas ĉiam prepozitivo aŭ esprimebla ankaŭ prepozitive. Fakte tio estas la ĝenerala principo de la Esperanta vort-farado, sed tamen ne absoluta, ĉar ĝi allasas tri esceptojn:

a) oni povas fari simplajn apudmetojn de substantivoj, de adjektivoj, de adverboj kaj de verboj: *kverkarbo* (= kverko-arbo), *surda-muta*, *vole-nevole*, *iri-veni*;

b) la rezult-adjekto, kiu en E-o esprimiĝas ne prepozitive, kiel en kelkaj lingvoj, sed rekte, per simpla adjektivo, tamen povas sinteziĝi: *iĝi klara* > *klariĝi*; *pentri ruĝa* > *ruĝpentri* (VER. III. 2.);

c) la prefiksoidoj adverbaj (re, dis, for, ek) kaj la prefiksoido uzataj prepozicioj (vd. § 373) povas eniri en kunmetojn kiel simplaj, rekte karakterizaj, prepozitive ne esprimeblaj adverboj: *revidi* (= ree vidi), *preteriri* (= pretere iri). Tial oni devas allasi la adverban analizon de flankelementoj ĉe verbaj ĉefelementoj, eĉ se ĝi ne validas pri adjektivaj radikoj.

SUBSTANTIVA ĈEFELEMENTO

291

Substantiva (o-finaĵa) ĉefelemento substantivigas la antaŭan flankelementon (VER. I.).

Do, se la flankelemento radike ne estas substantiva, en la vortkunmeto ĝi ricevas substantivan vort-karakteron. Ekzemple: *hom-koro* = *homokoro*; *varmenergio* = *varmo-energio*; *skrib-maŝino* = *skribo-maŝino*.

A. La kunmetojn oni povas analizi trimaniere:

1. La flankelemento esprimas *rilaton* aŭ *apartenon*, kiun oni povas signi per la prepozicio *de*. Tiun ĉi kazon ni nomu *analizo R.* (rilato).

Ekzemploj: *homkoro* (koro de homo), *lumradio* (radio de lumo), *varmenergio* (energio de varmo), *skribmaŝino* (maŝino de skribo).

2. La flankelemento esprimas *materialon*. Oni analizas per la prepozicio *el*. Ĝin ni nomas *analizo M.* (materialo).

Ekzemploj: *orĉeno* (ĉeno el oro); *ŝtonponto* (ponto el ŝtono); *vitrodomo* (domo el vitro).

3. La flankelemento estas *substantiva epiteto*. Oni analizas per simpla apudmeto. Ĝin ni nomas *analizo E.* (epiteto).

Ekzemploj: *membro-abonanto* (membro abonanto); *tajlor-majstro* (tajloro majstro); *scienculpedagogo* (scienculo pedagogo); *soldatkamarado* (soldato kamarado); *kverkarbo* (kverko arbo).

Konforme al la elasta senco de la prepozicio *DE*, la analizo R. estas interpretebla diversmaniere:

a) kiel simpla *poseda rilato* (genitivo); ekzemple: *urbdomo*: domo de urbo; *varmenergio*: energio de varmo;

b) kiel indiko pri tio, *por kio servas* la ĉefelemento; ekzemple: *skribmaŝino*: maŝino por skribo; *ŝarĝvagonaro*: vagonaro por ŝarĝo; *aerŝipo*: ŝipo por (veturo en) aero;

c) kiel indiko pri tio, *per kio funkcias* la ĉefelemento; ekzemple: *aer-*

bremso: bremsa (movata) per aero; *velŝipo*: ŝipo (movata) per velo;
martelbato: bato per martelo;

d) kiel indiko pri la *aganto*; ekzemple: *infanskribo*: skribo (farata) de infano;

e) kiel indiko pri la *objekto de ago*; ekzemple: *letterskribo*: skribo farata pri letero;

f) pri la *kvalita DE*, trovebla ĉe duoblaj flankelementoj, vd. § 314, Rim.

Al ĉi tiuj subsencoj de analizo R. aldoniĝas ankoraŭ analizoj M. kaj E. Por koni la precizan sencan de vorto, oni devas difini la manieron de analizo, t.e. la *interelementan rilaton* (Wüster). Tiu plej ofte doniĝas per si mem. Alifoje ĝin fiksas konvencio. Ekzemple: *paperskatolo* estas komprenata kiel *skatolo el papero* (analizo M.) dum *paperkorbo* kiel *korbo por papero* (analizo R/b). Aliaj ekzemploj: *poŝbesto* (analizo R/f), *poŝhorloĝo* (analizo R/a); *fiŝgluo* (analizo M.), *birdogluo* (analizo R/b).

B. Ofte oni povas signi la interelementan rilaton ankaŭ per la a-finaĵo gluita al la flankelemento: *ŝtonponto*: *ŝtona ponto*; *homkoro*: *homa koro*. Sed ne ĉiam. Ekzemple: *belkulto* ne estas *bela kulto* (kulto farata per belaj ceremonioj), sed *kulto de belo*.

La a-finaĵo estas uzebla nur:

- 1) kiam ĝia senco estas *-rilata*, *-apartena*, do kiam ĝi gluiĝas al substantivaj aŭ verbaj radikoj (homkoro: homa koro; amletero: ama letero);
- 2) kiam ĝia senco estas *-materiala* (*ŝtonponto*: *ŝtona ponto*).

Kiel ni vidas, en ĉiuj ĉi okazoj la a-finaĵo anstataŭas prepozicion: *koro de homo*, *letero de (pri) amo*, *ponto el ŝtono*.

La a-finaĵo ne estas uzebla:

- 3) kiam la flankelemento esprimas la objekton de la ago signita de l' ĉefelemento: *voluptamo* ne estas *volupta amo* sed *amo de volupto*. Nome: objekta DE-suplemento ne povas esti adjektive esprimita. Vd. § 140.

- 4) kiam la flankelemento estas radike adjektiva: *varm-energio* ne estas *varma energio* sed *energio de varmo*. Nome: ĉi-okaze la a-finaĵo estas pleonasma, do ne povas anstataŭi prepozicion.

C. Ĉar do la adjektiva analizo ne estas ebla en ĉiuj okazoj kaj propre per ĝi oni anstataŭiĝas ĉiam nur prepozicion, plej bone estas ĝin tute preteri ĉe la formado de la reguloj, kiuj tekstas:

O-finaĵa kunmeto estas korekta, se ĝi estas analizebla:

- a) per prepozicio inter du substantivoj (*homkoro* = *koro de homo*);
- b) per apudmeto (*soldatkamarado* = *soldato kamarado*).

Ne estas bona la kunmeto, se ĝi estas analizebla *nur* per la adjektivigo de la flankelemento.

Bluokulo, *Kardio*, *belknabino*, *bonpatrino*, *belpoto* kaj similaj do estas kontraŭaj al la reguloj de la vortkunmeto. Ili ja estus *okulo de bluo*, *Dio de karo*, *knabino de belo*, *poto de belo* ktp. Tia sintezo propre

estas nenio alia ol kaŝa elizio de la a-finaĵo: *blu okulo, kar Dio, bel knabino* ktp. Sed oni povus diri *belreĝino* (reĝino de belo).

Kiel ni vidis (§ 290), la vortkunmetaj reguloj de determino ne estas identaj kun la sintaksaj. En la sintakso, substantivon povas determini *adjektiva epiteto* (*bela domo*) kaj *suplemento* (*domo de urbo*). Male, ĉe vortkunmeto ĝin povas determini nur suplemento (*urbo-domo*). La adjektiva determinanto staras aparte: *bela domo, ne beldomo*.*

Rim. I. Kelkfoje, precipe en poemoj, oni trovas kunmetojn, kies substantiva flankelemento ŝajnas rilati al la ĉefelemento per kvalita a-finaĵo (*flamokuloj, falkrigardo* ktp.). Tiujn oni povas klarigi metafore (okuloj el flamo, rigardo de falko).

Rim. II. En kelkaj vortoj la adjektiveco de la flankelemento estas nur ŝajna. Ekzemple *libertempo* ne estas *libera tempo*, sed *tempo de libero*.

Rim. III. En aliaj okazoj (*bonfarto, bonodoro*), la ĉefelementoj estas ne la substantivoj (*farto, odoro*), sed la memstara o-finaĵo. Tie ĉi do troviĝas duoblaj flank-elementoj, pri kiuj validas apartaj reguloj (vd. § 301).

Rim. IV. Ni jam menciis (§ 276) la verajn prefiksojn, kaj la prefiksigon de radikoj. Pri tiuj ne validas la vortkunmetaj leĝoj, ĉar ili faras ne novajn vortojn, sed kva-zaŭ novajn radikojn. Ilian pritrakton vidu en § 408 k.s.

292

Substantivaj sufiksoidoj. Ĉar, kiel ni diris, inter radikoj kaj sufiksoidoj ne ekzistas esenca diferenco, la reguloj de vortkunmeto plene validas ankaŭ pri ĉi lastaj. Estas superflue do fari specialajn regulojn pri tio, ĉu iu sufiksoido povas ligiĝi al substantivaj, adjektivaj aŭ verbaj radikoj. Ĉiu substantiva sufiksoido povas ligiĝi al *ĉia* radiko (se la kunmeto entute havas sencon), sed ĝi ĉiam substantivigas la antaŭan elementon, do ĝi ligiĝas ĉiam al substantiva *vorto*.

Ekzemple ni povas fari la vorton *belisto*, kiu ne estas *bela isto*, sed *isto de belo* (estetikisto). Same: *densejo*: ejo de denso; *malliberejo*: ejo de mallibero; *ankrejo*: ejo de ankro(j); *ankradejo*: ejo de an' rado; *banujo*: ujo de bano; *saĝisto*: isto de saĝo.

Ĉiam laŭ la analizo R. ligiĝas: *ano, ero, ido, ingo, ismo, isto, estro, ujo, ilo, ejo*.

Ĉiam laŭ analizo E. ligiĝas: *ino, ulo, eco*.

Aĵo povas ligiĝi laŭ analizo E. (plejofte) kaj laŭ analizo R. (Pli detale vidu: § 328).

293

La o-finaĵo. Ĝia signifo estas: nomo de ideo aŭ objekto. Samtempe ĝi estas substantiva ĉefelemento antaŭ nesubstantivaj flankelementoj, kiujn do ĝi substantivigas. Per tio ĝi mem propre fariĝas superflua, ĉar ja ĝi estas la sola finaĵo, kies senco kaj vortefiko estas identaj. Tial oni povas ĝin ankaŭ ellasi, se oni signas ĝian ĉeston per apostrofo (skribe) kaj per la loko de la akcento (parole).

* Ĉar suplemento kelkfoje povas esti esprimita ankaŭ per infinitivo, kompreneble ĉe verba flankelemento oni povas uzi en tiaj okazoj ankaŭ infinitivan analizon: *pag-ordono*: ordono pagi. Sed tie ĉi la infinitivo havas substantivan funkcion kaj estas ĉiam anstataŭigebla per substantivo (ordono de pago). Kp. §§ 117 kaj 141.

Kiel ni jam vidis, la senco de la o-finaĵo estas iagrade elasta.

A) Post *adjektivaj radikoj* ĝi povas signi 1. abstrakton (la belo), 2. konkretajon (la beloj de l' regiono), 3. kvaliton (ŝia belo estis eksterordinara), 4. personon (mia kara, mia belo estis juna dano^Z). Sed sen la kunteksto ĉi tiu plursenceco naskus konfuzon. Tial, por simpla klarigo, ni apudmetas laŭ analizo E. la respektivajn sufiksoidojn. Tiel ni havos:

1. *abstrakto*: la belo;
2. *konkretaĵo*: belaĵo: belo aĵo: belo, kiu estas aĵo;
3. *kvalito*: beleco: belo eco: belo, kiu estas eco;
4. *persono*: belulo: belo ulo: belo, kiu estas ulo.

B) Post *verbaj radikoj* ĝi signas unuavice la nomon de ago (iro, konstruo), duavice la konkretan manifestiĝon, do la rezulton de la ago (altaj konstruoj). Por eviti necesokaze la dusencecon, ni apudmetas por klarigo la respektivajn sufiksoidojn. Do estos:

1. *ago*: konstruado: konstruo ado: konstruo, kiu estas ago;
2. *rezulto*: konstruaĵo: konstruo aĵo: konstruo, kiu estas aĵo;

Krome, post verbaj radikoj la o-finaĵo povas signi ankaŭ *abstraktaĵon*: amo, penso, kulturo. Por signi la agon mem, oni do apudmetas la sufiksoidon *ad*: amado, pensado, kulturado.

C) Post *prepozicioj* la o-finaĵo kondutas, kvazaŭ ĝi ligiĝus al adjektivaj radikoj (vd. § 296, C.). Ĝi signas ĉefe konkretajon: ĉirkaŭo, antaŭo, subo. Plej ofte oni uzas pli precizajn formojn kun *eco* aŭ *aĵo* (antaŭaĵo, antaŭeco, ĉirkaŭaĵo, eksteraĵo, kuneco, seneco, supereco, ktp.).

D) Post *prefiksoj* kaj tabel-vortoj ĝi same kondutas (malo, ekseco, diseco, foreco, kialo, kielo).

E) Post *interjekcioj* ĝi signas la nomon de la interjekciado: *vivuo*, *hurao*.

F) Post *partikuloj* oni plejofte ellasas la o-finaĵon, kaj la substantivecon oni signas per la artikolo aŭ pronomo. (Se la *se* ne ekzistus... Ĉiu havas sian *por* kaj *kontraŭ*). Same, oni ofte ellasas la o-finaĵon post *morgaŭ*, *hodiaŭ* kaj *hieraaŭ*. Ekzemple: *bela morgaŭ nin atendas*. Sed oni povas uzi ankaŭ la o-finaĵajn formojn: *morgaŭo*, *hodiaŭo*, *hieraaŭo*.

G) Post *numeraloj*, la o-finaĵo signas la nomon de la kvanto indikita de l' numeralo: *unu*o, *deko*, *dekduo*, *cento*, *milo*.

ADJEKTIVA ĈEFELEMENTO

Se la ĉefelemento estas adjektivo, la flankelemento devas esti substantivo; se ĝi havas alian radikkarakteron, ĝi substantiviĝas (VER. II.). Oni analizas per la prepozicio *je*.

Ekzemploj: *herbriĉa*: riĉa je herbo; *belriĉa*: riĉa je belo; varmplena: plena je varmo; *prespreta*: preta je preso; *servopreta*: preta je servo; *di-simila*: simila je dio; *sangavida*: avida je sango.

Ekzistas ankaŭ kunmetoj, en kiuj oni trovas simplan apudmeton de adjektivoj: *surda-muta*, *germana-franca vortaro*, *standardo ruĝa-blanka-verda*. Oni konservas la a-finaĵon de la flankelemento kaj uzas dividstrekon. Tiaj kunmetoj estas analogaj al *soldato-kamarado* aŭ *membro-*

abonanto (VER. I. analizo E., vd. § 289). Sed ili tute ne havas tian gravan signifon en la vortfarado, kiel la apudmeto de substantivoj, kaj tial ni ankaŭ ne formulis pri ili specialan regulon inter la vortefika regularo.

Rim. I. Kelkfoje la flankelemento estas adverbo, sed tiaokaze temas nur pri kunskribo de du vortoj en unu vorton. Ekzemple: *ore-purpura*, *komune-homa*, *dolĉe-acida*, *neĝe-blanka*, *multe-kapabla*. En tiaj vortoj oni plej ofte konservas la e-finajon de la flankelemento kaj uzas dividstrekon.

Rim. II. Vortoj ŝajne ne konformaj al VER. II. (*belaspekta*, *eksterordinara*, *facil-anima*, *plenkreska*, *plenplena* ktp.) havas a-finajon proprafunkcian. En ili do troviĝas duobla flankelemento, sekve pri ili validas speciala regulo (vd. §§ 303, 315).

La flankelemento de la adjektiva ĉefelemento do estas analizebla ĉiam per suplemento. Ĉar tia suplemento kelkfoje estas esprimebla ankaŭ per infinitivo, kompreneble ankaŭ ĉe la analizado oni povas tiam uzi infinitivan analizon: *parolema*: ema paroli; *aminda*: inda esti amata. Kp. § 291, piednoto.

295 La *adjektivaj sufiksoidoj* estas: *ebl*, *em*, *end*, *ind* kaj (neoficialaj) *al*, *esk*, *iv*, *oid* kaj *oz*. Pri ili plene validas la postuloj de VER. II.

Ekzemploj: *parolema*: ema je paroli; *portebla*: ebla (taŭga) je porti; *aminda*: inda je ami; *pagiva*: iva (kapabla) je pago; *herboza*: oza (riĉa) je herbo; *fereska*: eska (simila) je fero.

Ilian detalan pritrakton vd. §§ 347-356.

296 La a-finajo. Ĝi estas adjektiva ĉefelemento. Post *radikoj adjektivaj* ĝi do estas pleonasma. Post *radikoj substantivaj* kaj *verbaj* ĝi estas finaĵo *proprafunkcia*, do ĝi aldonas sian sencan al la senco de la radikoj. La senco de l' a-finajo estas duspeca:

1. *-rilata*, *-apartena*; 2. *-kvalita*.

A) Post *substantivaj radikoj* la a-finajo do signifas:

1. *-rilata*, *-apartena* (*reĝa palaco*: reĝapartena palaco; *homa mano*: homapartena mano; *muzika noto*: muzikrilata noto; *socia problemo*: socio-rilata problemo; *kotona industrio*: industrio de kotono). Plej ofte oni povas ĝin anstataŭigi per vortkunmeto (reĝpalaco, muziknoto).

2. *-kvalita*. Ĉi-sence ni povas distingi la jenajn nuancojn devenigeblajn el la senco de *-kvalita*:

a) kiu havas la *tutan kvaliton* de "o", do kiu estas *identa* al "o"; kiu estas mem "o". Ekzemploj: *reĝa persono* (persono kiu estas reĝo); *vidva viro* (viro kiu estas vidvo); *kotona planto*;

b) kies *materialo* estas "o", kiu estas el "o". Ekzemploj: *ora ĉeno* (ĉeno el oro); *ŝtona ponto* (ponto el ŝtono); *kotona ŝtofo*;

c) kiu estas *karakterizata* de "o"; kiu havas "o"-n. Ekzemploj: *ŝtona kampo* (ŝtonhava kampo); *kupra monto* (kuprohava monto); *kotona drapo* (kotonhava drapo);

d) kiu havas ian *kvaliton*, *manieron* de "o". Ekzemploj: *patra konsilo* (patromaniera konsilo); *olea glito* (oleomaniera glito);

e) kiu havas *iun* kvaliton, aspekton, ŝajnon de "o", do kiu estas *simila* al "o". Ekzemploj: *olea fluidaĵo* (oleoaspekta, oleoŝajna fluidaĵo); *vitraj okuloj* (vitrosimilaj okuloj); *kupra ruĝo* (kuprosimila ruĝo); *velura voĉo* (velur-elvoka voĉo).

Sencoj *c. d.* kaj *e.* estas miskompreneblaj, intermikseblaj kun sencoj *a.* kaj *b.* aŭ kun senco 1. Tial ili estas aplikeblaj nur helpe de la kunteksto. Por pliprecizigi oni uzas

anstataŭ senco *c* la vorton *hava* (ŝtonhava kampo), aŭ la vortojn *plena, riĉa* (ŝtonplena vojo, kuproriĉa monto), eventuale la vorton *dona* (arĝentodona minejo); ekzistas ankaŭ la neoficiala sufikso *oz* (*kuproza monto* kuproenhava monto);

anstataŭ senco *d* la vorton *maniera*, aŭ la afiksoidoj *laŭ-, kvazaŭ-, -eca* (patreca konsilo, oleeca glito, kvazaŭpatrina amo);

anstataŭ senco *e* la vortojn *aspekta, ŝajna, simila* aŭ la sufiksoidon *eca* (vitrosimilaj aŭ vitrecaj okuloj, oleoaspekta aŭ oleeca fluidaĵo).

Rim. I. Pro certaj konsideroj estus dezirinde havi specialan sufiksoidon de simileco kaj maniero. Por tio sin proponus la internacia *esk* (vd. § 353).

B) Post verbaj radikoj la a-finaĵo kiel adjektiva ĉefelemento ĉiam substantivigas la antaŭan radikon kaj al tiu ĉi verbosubstantivo ĝi ligiĝas kun sia senco. Do verbo-adjektivo estas ĉiam verbo-substantivo-adjektivo: *skriba* estas *skribo-a*. Sekve, post verbaj radikoj la a-finaĵo havas la samajn du sencojn kiel post radikoj substantivaj, t.e.

1. *rilata, apartena* (*nutra problemo*: nutrorilata problemo; *luma radio*: lum-apartena radio; *aŭda senso*: aŭdo-apartena senso). Oni povas ĝin anstataŭigi per kunmeto (lumradio, aŭdosenso) aŭ per *de* (radio de lumo, senso de aŭdo, problemo de nutro).

2. *kvalita* (*skriba informo*: skribkvalita informo; *luma globo*: lumkvalita globo; *tima homo*: timkvalita homo). Oni povas analizi ankaŭ per "*karakterizita de*" (globo karakterizita de lumo, homo karakterizita de timo). En ĉi tiu senco ni povas distingi du nuancojn:

a) ago kiel kvalito povas signi *emon, kapablon, povon* por la respektiva ago (*nutra manĝaĵo*: manĝaĵo, kiu povas nutri; *zorga patrino*: patrino, kiu emas zorgi). Precipe ofte estas uzataj tiel la kunmetaĵoj de *iga* (puriga, timiga, disiga). Multfoje tamen tia vortkonstruo estas miskompreniga, tial oni uzas la vortojn *pova, kapabla* (esprimpova, vivkapabla), eventuale la neoficialan sufiksoidon *iv* (voliva, sentiva, elvokiva, impresiva), aŭ la sufiksoidon *ema* (zorgema, sentema).

b) io karakterizita de ago povas signifi, ke io *faras* la respektivan agon (*konsterna sciigo*: konsternanta sciigo; *bata vipo*: batanta vipo). Oni do povas, precipe en la poezio, uzi verbo-adjektivon anstataŭ aktiva participo (kura knabo, sida homo, rigardaj okuloj), kio tamen devas resti malofta licenco.

c) io karakterizita de ago povas signifi ankaŭ, ke ĝi *suferas* la respektivan agon. Nome, en verbosubstantivoj, kiuj signas la nomon de ago, ne estas distingitaj aktiveco kaj pasiveco. Ekzemple en "skribo de knabo"

la senco de "skribo" estas aktiva (la knabo skribas), dum en "skribo de letero" ĝi estas pasiva (la letero estas skribata). Nu, ĉar la adjektivigo de verba radiko pasas ĉiam tra la substantivigo de la verbo, ankaŭ en verbo-adjektivoj same unuigas la sencojn aktiva kaj pasiva. Ekzemploj: *ĉagrena koro* (ĉagrenita), *ekscita konduto* (ekscitita), *fiksa salajro* (fiksita), *abstrakta senco* (abstraktita), *aflikta animo* (afliktita), *konfuza mieno* (konfuzita).

Do, helpe de kunteksto, kelkaj verbo-adjektivoj estas uzeblaj same en la senco de aktiva kiel en la senco de pasiva participo. Tiajn radikojn Wüster nomas *hibridaj*. Sed, kiel ni vidis, ne la radikoj mem estas hibridaj, sed nur ilia uzo, kiu estas plene pravigebla per la reguloj de la vortkonstruo. Kompreneble ili estas dusencaj, do uzeblaj nur helpe de kunteksto kaj precipe en poemoj. Cetere estas preferinde uzi la pli klaran partecipantan formon (ĉagrenanta momento, ĉagrenita koro; fiksanta najlo, fiksita tabulo).

Rim. II. Tiun ĉi hibridecon de la verbo-adjektivoj, uzatan nur sporade en la a-finaĵa formo, vaste utiligas la kunmetoj kun *ig*, kies strukturo estas klarigebla nur helpe de ili (vd. § 358).

C) Post **prepozicioj** la a-finaĵo montras, ke la prepozicio rilatanta al substantivo ne formas kun ĝi adjekton, kiel en prepozicia formo, sed montras ĝian kvaliton, aŭ pozicion rilate al io. Se ni signas la prepozicion per *x*, la senco de la a-finaĵa prepozicio estas: *estanta x*. Ekzemple: *antaŭa*: estanta antaŭ; *duma*: estanta dum; *kroma*: estanta krom; *sena*: estanta sen; *kontraŭa*: estanta kontraŭ ktp. *Pera* estas speciala okazo, ĝi devenas el aparta verba radiko *peri* (vd. § 394, Rim. III.).

Rim. III. La ĉi-supraj a-finaĵaj formoj estas la bazaj formoj por pluformado de prepozicioj. El la vidpunkto de finaĵa pluformado la prepoziciojn oni povas rigardi kvazaŭ adjektivaj radikoj.

D) La **prefiksojn** kaj **prefiksoidojn** (dis, ek, eks, for, fi, mal, bo, ge, re) oni same povas rigardi adjektivaj radikoj el la vidpunkto de pluformado (disa, eksa, fora, fia, mala, boa ktp.).

E) Same kiel adjektivaj radikoj kondukas la **primitivaj adverboj** (preskaŭa, apenaŭa, kvazaŭa). Sed *morgaŭ*, *hieraaŭ* kaj *hodiaŭ* kondukas kiel substantivaj radikoj (*morgaŭa*: rilatanta al morgaŭo).

F) Post **numeraloj** la a-finaĵo signas vicnumeralojn (unua, dua ktp). Ĉar tie ĉi ĝia funkcio estas speciala, ne konforma al la ordinara senco, ĝi ne povas elfali ĉe la pluformado per *-eco* (unuaceco).

VERBA ĈEFELEMENTO

297

Se la ĉefelemento estas verbo, la flankelemento fariĝas

1. *adverbo*. Ekzemploj: *bonfarti* (bone-farti); *kunludi* (kune-ludi); *ekiri* (eke-iri); *subaĉeti* (sube-aĉeti); *pafmurdi* (pafe-murdi); *inkskribi* (inke-skribi); *rondiri* (ronde-iri). (VER. III. 1).

2. *predikata adjektivo*. Ekzemploj: *ruĝpentri* (pentri ruĝa); *plenŝtopi* (ŝtopi plena); *dispafi* (pafi ion disa); *kunrasti* (rasti ion kuna); *kunpremi* (premi kuna); *satmanĝi* (manĝi sata); *mortpiki* (piki iun morta). (VER. III. 2.).

Rim. I. Tie ĉi, kiel oni vidas, la predikata adjektivo montras la *rezulton* de la ago: *kunrasti foliojn*: rasti ilin tiel, ke ili iĝas kunaj. Teorie oni povas esprimi per predikata adjektivo tiun signifon de rezulto eĉ ĉe netraktivaj verboj: *kunveni*: veni kunaj (kunen): veni tiel, ke ili iĝas kunaj; *disiri*: iri disaj, iri tiel, ke ili iĝas disaj. La avantaĝo de tio estas, ke tiel oni povas per la du ĉi-supraj analizoj elĉerpi ĉiujn eblojn kaj oni ne devas starigi trian analizon (kunen, disen), por distingi inter *kunrasti* kaj *kunveni*. Efektive *kun* ja en la du okazoj estas rezulta predikata adjektivo, sed ĉe *kunrasti* ĝi rilatas al la objekto, dum ĉe *kunveni* al la subjekto, same kiel ĉe *kuniĝi* (iĝi kunaj).

Tamen, se tio estas tro malfacile konceptebla por iu, li povas kompreni la ĉi-suprajn regulojn tiel, ke la flankelemento signas

1. la manieron de la ago: *pafmurd*, *kunlabori*;

2. la rezulton de la ago: *kuniĝi*, *kunveni*, *disiri*, *satmanĝi*.

Rim. II. Antaŭ verba ĉefelemento nur malofte funkcias adjektivradika vorto adverba, plejofte ĝi havas adjektivan (rezultan) sencon. Ekz-e *laŭtleĝi* ne estas *laŭte legi*, sed *legi* (tekston) *laŭta* (tiel ke ĝi iĝas laŭta). Tiel oni povus diri ekz-e: *mallaŭte laŭtleĝi*, ĉar *mallaŭte* karakterizas la agon, kontraste al *laŭte*, dum *laŭt-* karakterizas la legataĵon, kontraste al *muta*, *silenta*.

Rim. III. Jam temis pri tio, ke la vortojn, en kiuj la flankelemento ŝajnas la rekta objekto de la ĉefelementa verbo, ni analizas alimaniere (vd. § 306, Rim.).

Verbaj sufiksoidoj. Tiaj estas: *igi* kaj *iĝi*, kaj (neoficiala) *izi*. Krome, post substantivaj radikoj, kiel verba sufiksoido funkcias ankaŭ *ad*, ĉar ĝi enhavas la elementon *i* (ado estas i-o).

298

Komprenoble, la vortefikaj reguloj validas ankaŭ pri la verbaj sufiksoidoj, kiuj ja estas verbaj elementoj.

Pri *igi* kaj *iĝi* validas VER. III. 2. Do la antaŭa elemento iĝas predikata adjektivo. Ekzemploj: *beligi* (igi bela); *puriĝi* (iĝi pura); *ŝtatigi* (igi ŝtata); *grupiĝi* (iĝi grupa); *manĝigi* (igi manĝa) [manĝanta aŭ manĝata], *sidiĝi* (iĝi sida); *ruliĝi* (iĝi rula [rulata]). Pli detale vd. §§ 358-359.

Pri *izi* validas VER. III. 1. Ekzemplo: *ŝtonizi* (izi ŝtone [per ŝtono]).

Pri *ado* (i-o) validas VER. III. 1. Ekzemplo: *martelado* (ago-i martele [per martelo]). Pli detale vd. § 326.

Verbaj finaĵoj. La verbaj finaĵoj post verbaj radikoj estas pleonasmaj. Post alikarakteraj radikoj ili funkcias proprasence, kaj havas vortefikon konforme al VER. III. Ili do faras la antaŭan elementon adverbo aŭ predikata adjektivo. Ilia senco estas *agi* aŭ *funkcii*, se la flankelemento estas adverbo; kaj *esti*, se la flankelemento estas predikata adjektivo.

299

A) Post substantivaj radikoj la verba finaĵo ĉiam adverbigas la radikon. Konforme al la diversaj sencoj de la adverbo, la substantivo-verboj estas analizeblaj jene:

1. Se la radiko signifas *ilon* aŭ *korpoparton*, la analizo estas: *agi, funkcii per*. Ekzemple: *marteli* (i marteles, *agi per* martelo), *brosi, butoni, forkii, peniki, sabri, vipi, ankri, skurĝi, tamburi, trumpeti, najli, kateni, ŝraŭbi, fingri, korni, denti, genui, frunti, ŝultri, dorsi, beki* ktp.

2. Se la radiko signifas alian objekton, *agi per* povas signifi *provizi per*. Ekzemple: *gudri, trui, adresi, doti, elektri, feri, ori, stani, makuli, nomi, sali, seli, vesti, veneni, digi, ŝtoni, fundamenti, kupri* ktp. Oni uzas ĉi-sence ankaŭ la sufikson *um* (orumi, akvumi), aŭ, precipe en la teknika lingvo, la sufikson *iz* (orizi, kuprizi). Por "provizi per lumo" oni diras *lumigi* (igi luma: igi karakterizata de lumo): vorto dusenca, ĉar ĝi signifas ankaŭ *igi lumanta*. Tamen ĝin sankciis ĉi-sence la lingvouzo kaj la pli preciza *lumumi* ne povis ekradiki. (Kp. § 399, piednoto).

3. Ĉe kelkaj radikoj *-i* signifas: *agi karakterizate de* (tute elastsence). Ekzemple: *bordi* (albordiĝi), *pendoli, flami, nesti, limi, ordi, reguli, publiki, hejmi, nombri, kongresi, silabi, poemi, vorti, fabriki, mieni, formi* ktp. Ĉi-sence la signifo estas ofte produkti: *sumi, flori, ĝermi, signi, fumi, ondi, radii, sangi, streki* ktp.

Rim. Analizi tiajn vortojn per agobjekta flankelemento (*signi = -i signon*) ŝajnas nekonsilinda, ĉar per tio leĝiĝus tiu ĉi tipo de kunmetoj, ne responda al la lingvouzo (vd. § 306, Rim.). Cetere, doni al *-i* tiel varian senceon, kiel: *disvolvi* (floron, ĝermon), *ellasi* (fumon, sangon, radiojn), *meti* (signon, strekon), *fari* (sumon), ne estas pli preciza klarigo ol "agi aŭ stati karakterizate de la radiksenco", do *-i flore, ĝerme, fume, sange* ktp. Tiel povas *nesti* signifi jen *fari neston*, jen *loĝi en nesto*.

4. Ĉe radikoj signifantaj *personon*, la signifo estas *agi aŭ stati kiel*: dum *tajlori* estas plie *tajlore agi*, *gasti* estas plie *gaste stati*. Pluaj ekzemploj: *reĝi, patri, mastri, amiki, cezari, dandi, ĉefi, estri, majstri, tirani, frazisti, saĝisti, profeti, ĉarlatani, aktori, generali* ktp.

B) Post **adjektivaj radikoj**, la analizo estas multe diskutata. Kelkaj entute kondamnas tiajn kunmetojn (Isbrücker), kiel nekorektajn. Tamen, kiel pruvis de Hoog, ilin pravigas zamenhofaj ekzemploj kaj la pli kaj pli ĝeneraliĝanta kutimo.

Efektive, ĉe Z. troviĝas *kuraĝi, sani, malsani, avari, malsati, fieri, egali, sufiĉi, pravi, malpravi, favori, utili, superi* (la tri unuaj eĉ en la Fundamenta Ekzercaro!); ĉe Grabowski *sobri, prudenti, juni, preti, pali, modesti, forti* (apenaŭ mi fortas por diri...), *alii* (ol); ĉe aliaj *indi, muti, laci, beli, nigri, vasti, verdi, ruĝi, nigri, necesi*; eĉ *aŭdebli, videbli* (Rotkviĉ), *rimarkindi, komprenebli, konsiderindi* (Degenkamp), *oportuni* (Faulhaber).

La kaŭzon de plioftiĝo de tiaj formoj Edmond Privat (*Esprimo de sentoj en Esperanto*) vidas simple "en la emo de sentoj elekti prefere, kiel plej trafan esprimilon, ĉiam la malplej kutiman formon". Do "la kaŭzo de la uzo estas antaŭ ĉio la malofteco de la formo kaj pro tio ĝia frapeco". Nu, ĉi tio certe estas ĝusta en multaj okazoj: la "serĉo de

novo” instigas fari vortojn kiel *netolereblas* aŭ *malpermesendas*. Sed Privat mem emfazas la diferencon inter *la maro bluas* kaj *la maro estas blua*, *la kampoj verdas* kaj *la kampoj estas verdaj*. Kaj ĉi tiun diferencon sentas ankaŭ tiu, al kiu la cititaj adjektivo-verboj jam estas familiaraj. Ne estas do superflue esplori pli detale ĉi tiun demandon, kiel faris de Hoog en aparta broŝuro.

Antaŭ ĉio, ni konfirmu lian konstaton: ”Ĉi tiu fenomeno estas pli komplika, ol ĝi ŝajnas je la unua vido”.

Sendube, kelkaj tiaj formoj (*simili, utili, rapidi* ktp.) estas ĝenerale akceptitaj kaj tute familiaraj, aliaj (rigardu kelkajn el la supre cititaj) estas nekutimaj, pli-malpli eksterordinaraj, se ne ekstravagancaj. Kiel fari do disjuĝon inter ili? Ankaŭ ne estas ĉiam nur la klopodo je frap-eco, precipe en la poezio, kie oni ofte devas ŝpari silabojn kaj trovi rimojn; ankaŭ ĉi tiuj du bezonoj klarigas multajn tiajn formojn. Ĉu rigardi do tiujn nur pli-malpli tolerataj poeziaj licencoj, aŭ postuli por ili civitanecon ankaŭ en la ĉiutaga prozo?

Ni devas diri, ke *teoriè* ĉiu tia formo estas regula. Laŭ la 11-a regulo de la Fundamenta Gramatiko, nome, la verbfinajo ”estas rigardata ankaŭ kiel memstara vorto”. Kaj, ĉar adjektivo-verbaj kunmetoj (ekz-e *purigi = igi pura*) estas neriproĉeblaj, ankaŭ la adjektivo-verbfinajaj kunmetoj estas sendube korektaj.

Tio, ke la naciaj lingvoj ne uzas tiajn formojn, ne estas forta argumento, ĉar, unue, E-o povas havi siajn proprajn leĝojn, due, la naciaj lingvoj mem ne estas unuecaj ĉi-rilate. Ekz-e el la sama substantivo *Hunger* la germana tiras *hungrig* (malsata) kaj *hungern* (malsati), dum el sia *faim* aŭ *fame* la franca aŭ la itala ne povas tiri verbon (*avoir faim, aver fame*). La Germano kaj la Franco povas *silenti* (*schweigen, se taire*), dum la Anglo sole *esti silenta* (*to be silent*). En la germana oni povas diri *verdi* (*grünen*), dum la franca, la itala kaj la hungara devas uzi sufikson (*verdoyer, verdeggiare, zöldeni*). Por respondi al *sufiĉa* A.F.D. havas verboformon (*to suffice, suffice, genügend*), sed la hungara aŭ la rusa ne. Ankoraŭ pli da malkongruo oni trovas certe en la ekstereŭropaj lingvoj.

Esplorante la diversajn adjektivojn, ni vidas, ke ili – kiel de Hoog atentigas en sia verketo – ne estas samspecaj. Jam dekomence ni apartigu la rilat-adjektivojn, kiuj devenas de substantivaj radikoj, ĉar ili ĉe sia verbigo jam ne kondukas kiel adjektivoj, sed kiel verbfinaje pluformitaj substantivoj (ekz-e *patra – patri, ora – ori*).

Ankaŭ ĉe la adjektivradikaj adjektivoj ni povas konstati rimarkindajn diferencojn. Ni prenu ekz-e la tri adjektivo-verbojn *utili, kvieti, beli*. La unua similas al agverbo (ekz-e *helpi*), la dua al statverbo (ekz-e *riposi*), la tria, male, estas iel kvalifika, al kiu oni apenaŭ povas trovi verbon analogan. Kaj certe ni trovas ankaŭ ĉi lastan la malplej kutima kaj akceptebla el la tri. Multe pli facile ni familiariĝas al la verboj *sufiĉi* aŭ *inklini*, kies radikoj tamen, evidente ne apartenas al tiu kategorio, al kiu

util aŭ *kviet* apartenas, nek al la sama kategorio inter si. Do ekzistas pluraj diversaj adjektivkategorioj; ĉi tiujn oni devas, kiel ties neceson de Hoog emfazas, aparte esplori el la vidpunkto de ilia verbigebleco. Provante klasi la adjektivojn tiucele, oni ricevas la sekvantajn grupojn: adjektivoj de ago, de konduto, de stato, de atribuo, de helpverba funkcio kaj de aja kvalito.

1. La adjektivoj de *ago* karakterizas ian agon; ilia verba formo esprimas tiun agon per ties maniero, tiel ke la agverbo mem estas nur subkomprenata kiel evidenta. Ekz-e anstataŭ *soni laŭte* oni diras *laŭti*. Tiaj adjektivoj estas – ni metas parenteze la subkomprenatan verbon –: *aktivi* (labori –e), *atenti* (aŭskulti, rigardi –e), *avidi* (deziri –e), *ĉarmi* (efiki –e), *diligenti*, *fervori* (labori –e), *kulpi* (agi –e), *lami* (iri –e), *laŭti* (soni, paroli –e), *prudenti* (pensi –e), *rapidi* (iri, agi –e), *sagaci*, *saĝi* (pensi –e), *soleni* (festi –e), *sovaĝi* (agi –e), *spriti* (paroli –e), *utili* (efiki –e). La senco de la adjektiva kaj verba formoj ne estas tute la sama: la adjektiva formo esprimas ĝenerale konstantan emon aŭ econ, la verba formo ties okazan manifestiĝon en ago.

2. La adjektivoj de *konduto*, en sia verba formo, prezentas tiun konduton en aktuala sinteno aŭ ago. Do: *afabli* = *konduti afable*. Tiaj estas: *afabli*, *avari*, *boni* – *malboni*, *bravi*, *ĉasti* – *malĉasti*, *fideli*, *fieri*, *firmi*, *frenezi*, *frivoli*, *furiozi*, *ĝentili*, *humili*, *indiferenti*, *intimi*, *krudi*, *krueli*, *modesti*, *muti*, *naŭvi*, *nobli*, *obstini*, *pacienti*, *rigidi*, *ruzi*, *seriozi*, *severi*, *sinceri*, *surdi*, *vanti*. Ankaŭ tie ĉi ekzistas la diferenco inter la konstanta signifo de la adjektivo kaj la okaza signifo de la verbo: *li estas obstina* (laŭnature), *li obstinas* (en ia afero). La adjektiva formo estas uzebla en ambaŭ sencoj, sed la verba nur en la dua: *li surdas al la petoj*; *li vantas pri sia sukceso*.

3. La adjektivoj de *stato*, en sia verboformo, estas analizeblaj kun adverba flankelemento (stati –e) kaj ankaŭ kun adjektiva (esti –a). Ekzemploj: *ebrii*, *feliĉi*, *gaji*, *kvieti*, *laci*, *preti*, *sani* – *malsani*, *sati* – *malsati*, *sobri*. La senco de la adjektivaj kaj verbaj formoj ĝenerale estas la sama, sed ĉe kelkaj la lingvuzo faris nuancdistingon. Ekz-e oni diras: ”li *ebrias* de ĝojo”, sed ”li *estas ebria* de konjako”; *malsati* signas plie devigitan aŭ intencan nemanĝon, *esti malsata* plie la simplan okazan malplenen de stomako.

4. La adjektivoj de *atribuo* signas ne ian econ aŭ emon propran al la determinato, sed ian markajon atribuitan al ĝi baze de takso, konsidero, proporcio, ekstera cirkonstanco. En verboformo ili estas analizeblaj sole per adjektiva flankelemento (esti –a): *egali*, *fremdi*, *gravi*, *ĝusti*, *identi*, *justi*, *kari*, *konformi*, *nepri*, *pleni*, *pravi* – *malpravi*, *propri*, *sami*, *simili*, *sufiĉi*, *validi*, *vani*. Inter ĉi tiuj kaj la adjektivaj formoj (esti –a) ne ekzistas eĉ nuanceto da diferenco.

5. La adjektivoj de *helpverba funkcio* estas tre similaj al la ĵus-antaŭaj: tia sama estas ilia analizo, tia sama la manko de nuancdiferenco inter la verboformo kaj la adjektivo plus ”estas”. Ni metis ilin en apartan

grupon pro tio, ĉar ili estas uzataj plej ofte kun infinitivo kaj tiel ili estas parencaj al la modaj helpverboj (povi, devi, voli) aŭ al radikverbaj verboj aliaj, postulantaj same infinitivon. Tiaj adjektivradikaj verboj estas: *ebli* (pasiva "povi"), *emi* (voli), *indi* (valori), *inklini* (voli), *kapabli* (povi), *necesi* (pasiva "bezoni"). Tien ĉi oni povas klasi ankaŭ la verbon *kuraĝi* (ekz-e: *mi kuraĝas veti*), uzatan ekskluzive kun infinitivo; en ecomontra signifo oni uzas nur la adjektivon plus "estas": *li estas kuraĝa*. Ankaŭ *sufiĉi* kaj *vani* povus esti klasitaj tien ĉi; la limoj inter la grupoj 4. kaj 5., kiel dirite, estas tute fluidaj.

6. La adjektivoj de *aĵa kvalito* signas la esencan kvaliton aŭ la aspekton de la aĵoj; ili estas do konstatoj, kaj, kiel tiaj, ne esprimeblaj verbe. Ekzemploj: *agrabla, akra, alta, antikva, bela, densa, dika, dolĉa, ebena, glata, granda, juna, kripla, pala, plata, varma* kaj la kolor-adjektivoj: *blanka, flava, griza, nigra, ruĝa* ktp. Ilian verboformon fakte oni ne uzas, aŭ ne ĝuste uzas, kiam oni objekte konstatas: *ĉi tiu gusto estas agrabla; la tabulo estas nigra; ŝia vesto estas blua; lia filo estas granda*. Sed ne ĉiam oni konstatas tiel objekte. En emfaza stilo la senpera verbigo povas fari, ankaŭ ĉe tiuj ĉi radikoj, specialajn efektojn, doni dinamikon al la diro: *kiom agrablis tiu gusto al mia lango!; rigardu, io nigras en la angulo!; la ĉielo bluas al ili kiel belega promeso; post eliro el la flankstrato antaŭ ni grandegis la katedralo*. Tamen, kiel de Hoog prave avertas, tiun stil-efekton oni ne devas trouzi, ĉar tiam ĝi trivialiĝas, perdas sian specialecon. Ĉi tie nome temas pri poezia rimedo: pri la personigo de la aĵoj, ĉar nur tiamaniere oni povas verbigi, do agigi ilian kvaliton aŭ aspekton. La analizo povas esti: (*impres*)i *agrable, nigre, blue, grandege*.

Resume ni povas diri, ke: a) la senpera verbigo de la adjektivoj en E-o teorie estas korekta kaj baziĝas ankaŭ sur zamenhofaj ekzemploj (ke Z. ĝin malaprobis en sia Lingva Respondo de 1907, tio, kiel de Hoog pruvis, estas miskompreno*); b) tamen, simple anstataŭigi la adjektivan formon per la verba oni ne povas en ĉiu okazo, ĉar la du formoj ne ĉiam havas la saman signifon kaj oni devas atenti pri tiuj nuancdiferencoj, kiujn ni ĉi-supre montris; c) ĝenerale oni rezervu la senperan verbigon por specialaj efektoj; oni ne plenigu sian tekston per tiaj formoj, ĉar tio efikos fremde, nenature, afekte. Tiu ĉi averto ne rilatas al la jam enradikiĝintaj formoj (vd. la zamenhofajn ĉi-supre, kaj eble tiujn sub punkto 4-5).

* Ĉi tie nur tiom, ke en letero al D-ro Stamatiadis (18.XI.1910) Zamenhof skribis pri la traduko de du grekaj verboj *eusebeô* kaj *eutulĥeô*: "ŝajnas al mi, ke plej bone estas traduki ilin per du vortoj (*esti pia, esti feliĉa*); sed se oni nepre bezonas havi unu vorton, oni povas traduki: *piesti, feliĉesti*, aŭ (eble eĉ pli bone) simple: *pii, feliĉi*".

C) Post **prepozicioj** la verba finaĵo adjektivigas la prepozician flank-elementon, farante ĝin sia predikata adjektivo. Ekzemploj: *antaŭi* (esti antaŭa), *apudi* (esti apuda), *ĉirkaŭi* (esti ĉirkaŭa), *kontraŭi* (esti kontraŭa), *laŭi* (esti laŭa), *superi* (esti supera), *anstataŭi* (esti anstataŭa). Pri *peri* vd. § 394, Rim. III.

D) Post **aliaj elementoj**, interjekcioj ktp. la analizo de la verba finaĵo estas *agi per*, *funkcii per*. Ekzemple: *jesi* (agi per jes), *nei*, *adiaŭi*, *vivui*, *bisi*, *hurai* ktp. Kelkfoje: *esti -a*; ekzemple: *fii* (esti fia).

ADVERBA ĈEFELEMENTO

300

Krom la primitivaj adverboj (*morgaŭ*, *apenaŭ*, *tuj* ktp.), ne funkciantaj kiel ĉefelementoj, ĝenerale ne estas necese distingi radikelementojn adverbajn, ĉar ili ĉiam estas rekondukeblaj al adjektivaj radikoj. Eĉ la primitivajn oni povas rigardi derivitaj el adjektivoj per "signo nula".

Tamen, ekzistas sola speco de adverba ĉefelemento, ne rekondukebla al adjektivo: kiam du adverboj estas simple apudmetitaj (*vole-nevole*, *pli-malpli*, *trafe-maltrafe* ktp.). Tio estas analoga al la formoj *soldato-kamarado* kaj *surda-muta*. Sed troviĝas nur kelkaj malmultaj tiaj esprimoj, do ĉi tiu speco de kunmeto havas nenian gravan signifon en la vortfara sistemo.

Rim. I. La vortojn *presprete*, *sangavide*, *aminde* ktp. oni povas rekonduki al *prespreta*, *sangavida*, *aminda* ktp. La diferenco estas nur, ke la adverbaj formoj karakterizas ne substantivon, sed verbon aŭ adjektivon.

La e-finaĵo. Konforme al la parenceco inter la a-finaĵo kaj e-finaĵo, post *adjektivaj radikoj* la e-finaĵon, el la vidpunkto de vortkonstruo, oni povas rigardi kvazaŭ pleonasma. La sola diferenco estas, ke la a-finaĵo rilatas al substantivo, dum la e-finaĵo rilatas al verbo aŭ al adjektivo. La parencecon montras la adjektiviĝo de adverbo, eĉ primitiva, post la substantivigo de ĝia adjektivo aŭ verbo (forte bati – forta bato; pale verda – pala verdo; tro rapidi – tro rapida – troa rapido; tuj veni – tuja veno).

A) Post **substantivaj radikoj** la senco de e-finaĵo plej ĝenerale estas *maniere*, aŭ *laŭ la maniero de*. Ekzemple: *reĝe* (laŭ maniero de reĝo). Ĉi tiu *maniere* estas komprenebla en la plej vasta senco (*karakterizate de*). Ĝi povas signi:

1) la *ilon*, per kiu la respektiva ago okazas (per). Ekzemple: bati *martele* (per martelo); la ventego batis *onde* la ŝipon (per ondo); mezuri *pede* la vojon (per piedo); informi *letere* (per letero); puŝi *korne* (per korno); pafi *kugle* (per kuglo).

2) la *lokon*, kie la ago okazas (en, ĉe, sur). Ekzemple: stari *porde* (ĉe pordo); sidi *seĝe* (sur); promeni *ĉambre* (en).

3) la *tempon*, kiam la ago okazas: promeni *nokte* (dum nokto), danci *dimanĉe* (en dimanĉo).

Rim. II. Kompreneble tio estas ebla nur, kiam la loka aŭ tempa signifo estas evidenta el la vorto mem. Oni do ne povas diri ekz-e *sidi hunde* (sur hundo), ĉar tio signifas plie *sidi hundmaniere*. Same, ĉe Grabowski: *tempeste* (dum tempesto) *forlasis la ŝipo la havenon* estas neklara, ĉar *tempeste* plie signifas *tempestmaniere*.

Ĉar *e* estas parenca al *a*, ankaŭ ĝi povas enhavi la signifon *kvalit*. Ĝia senco do povas esti *-kvalite*. Ĉi-sence oni povas distingi du subsencojn: 4) *tutkvalite*, tio estas *kiel*. Ekzemploj: ĉeesti *gaste* (kiel gasto), roli *aktore* (kiel aktoro).

5) *unu-*, aŭ *kelkkvalite*, tio estas *kvazaŭ*. Ekzemploj: senti *patre* (kvazaŭ patro); gliti *olee* (kvazaŭ oleo); gastigi *reĝe* (kvazaŭ reĝo). Ĉi-sence oni povas uzi ankaŭ la sufiksoidon *ec* (patrece, oleece, reĝece). Vd. ankoraŭ *esk* § 353.

B) Post **verbaj radikoj** oni trovas la sekvantajn sencojn:

1) *per*. Ekzemploj: murdi *pafe* (per pafilo); informi *skribe* (per skribo); kaŝi *kovre* (per kovro); vidi *sonĝe* (per sonĝo); atingi *kure* (per kuro).

2) *kvalite*, tio estas, havante la respektivan agon kiel kvaliton. Ĉi-sence, kiel la adjektiva finaĵo (vd. tie: § 296, B), ankaŭ la e-finaĵo povas preskaŭ egalvalori al *participo*;

a) *aktive*: skribi *stare* (starante); veni *helpe* (helpante); flati *tente* (tentante);

b) *pasive*: miri *konsterne* (konsternite); rigardi *ekscite* (ekscitite); aŭskulti *ĉagrene* (ĉagrenite). Anstataŭ ĉi tiu formo, se la kunteksto ne helpas sendube, estas konsilinde uzi la partecipian formon.

Rim. III. La supraj sencoj estas eksplikajblaj ankaŭ per: *karakterizate de*. Ekzemple: skribi *stare* (karakterizate de staro); veni *helpe* (karakterizate de [sia] helpo); aŭskulti *ĉagrene* (karakterizate de [onia] ĉagrenado).

C) Post **prepozicioj** la e-finaĵo montras, ke la senco de la prepozicio rilatas al la predikato, signante ĝian manieron aŭ cirkonstancon (iri aŭ esti *antaŭe*, *malantaŭe*, *apude*, *pretere*; agi *dume*, *poste*, *anstataŭe*, *krome* ktp.). Same ĉe *interjekcioj* (krii *bise*, *fie*, *vivue*, *hurae*).

D) Post **primitivaj adverboj** la e-finaĵo estas superflua pleonasm, ĉar ĝi nenion aldonas al la radikoj, nek sence, nek vortkonstrue, nek gramatike. Kelkfoje, precipe en la poezio oni renkontas *troe*, *tree*, *nune*. Post la *aŭ-adverboj* preskaŭ neniam oni uzas la e-finaĵon.

Rim. IV. La aŭ-adverboj (morgaŭ, apenaŭ, ankaŭ, ankoraŭ, almenaŭ ktp.) propre estas puraj adverboj, tiel do nenio motivas ilian apartan formon. Jam okazis provoj uzi ilin en simpla adverbaj forma (*morge*, *apene*, *anke*, *ankore*, *almene* ktp.), kio cetere kunportus ankaŭ la simplan formon adjektivan (*ankora*, *almena*, *apena*) kaj substantivan (*hiero*, *hodio*, *morgo*). Tiuj provoj eĉ estas oficiale *tolerataj* de la Akademio (Raporto de prezidanto Boirac: *Oficiala Gazeto*, Aprilo 1910). La grandan forton de la E-a tradicio pruvas, ke tiu ŝanĝo, malgraŭ siaj avantaĝoj kaj malgraŭ la oficiala nekondamno, tamen ne povis enhejmiĝi.

Laŭ la eldiro de Z. la aŭ-finaĵo en la adverbo "ne apartenas al la radikoj" kaj oni povas ĝin anstataŭigi per apostrofo: *ankor'*, *apen'*. Sed krom kelkaj sporadaj provoj en la poezio, ankaŭ tiu permeso de Z. ne estis atentata.

B. TRIELEMENTAJ KUNMETOJ

INTERELEMENTA GRUPIĜO

301

La ĝisnunaj pritraktoj koncernas la kunmetojn el du elementoj.* Se en la vortkunmeto troviĝas pli ol du elementoj, la afero komplikiga. Nome, tiuj elementoj povas grupiĝi inter si diversmaniere.

En tiaj tripartaj, trielementaj vortoj do unue oni devas esplori la grupiĝon de la elementoj, tio estas, konstati la *interelementan grupiĝon*.

Tiurilate ekzistas du eblaĵoj:

1) la lasta elemento rilatas al la du antaŭaj elementoj; ekz-e: *vaporŝip-asocio* (asocio de vaporŝipoj);

2) la du lastaj elementoj formas unu tuton, kaj kiel tuto ili rilatas al la antaŭa elemento; ekzemple: *aŭto-aerbremsa* (aerbremsa de aŭto).

En la unua okazo ni parolas pri **duobla flankelemento**, en la dua okazo pri **duobla ĉefelemento**.

La duoblan flankelementon do oni povas signi per (C-B)-(A).

La duoblan ĉefelementon oni povas signi per (C)-(B-A). Pli detalan simbolaron oni trovas § 313.

La du rilatojn ni trovas ankaŭ ĉe tiaj vortoj, kies lasta elemento estas *sufiksoido*. Ekzemple:

1. **Duobla flankelemento**: tipo (C-B)-A: *kudrilujo* (kudril)-(ujo): ujo de kudriloj; *skribmaŝinaro*: (skrib-maŝin)-(aro): aro de skribmaŝinoj; *fervoĵisto*: (fer-voj)-(isto): isto de fervojo. Same kiel ĉe *vaporŝip-asocio*.

NB. La unuan el la du flankelementoj ni nomas *maldekstra*, la duan, postan, *dekstra* flankelemento.

2. **Duobla ĉefelemento**: tipo (C)-(B-A): *korboneco* (kor)-(bon-eco): boneco de koro; *kestŝlosilo*: (kest)-(ŝlos-ilo): ŝlosilo de kesto; *orkandelingo*: (or)-(kandel-ingo): kandelingo el oro. Same kiel ĉe *aŭto-aerbremsa*.

Kaj la samajn du tipojn ni trovas ankaŭ ĉe vortoj, kies ĉefelemento estas *finajo*. Ni vidis, ke la finajo povas esti proprafunkcia, nepleonasma elemento kaj ĉi-okaze ĝi mem fariĝas la ĉefelemento de la vorto (*marteli*: i marteli; *homa*: hom-kvalita). Do ankaŭ la finajo povas rilati jen al la

* La vorton *elemento* ni uzas alisence en unuradikaj kaj plurradikaj vortoj. En *unuradikaj* vortoj la finaĵoj ni kalkulas aparta elemento kaj tiel ni parolas pri samelementaj kaj malsamelementaj vortoj. En *plurradikaj* vortoj, male, ĉiun radikon kune kun sia finaĵo (videbla aŭ latentata) ni rigardas *unu elemento*. Apartajn elementojn formas nur tiuj finaĵoj, kiuj estas tute memstaraj kaj ne rilatas senpere al la elemento, kiun ili sekvas.

Ekzemple: *urbodomo* estas duelementa vorto (*urbo* kaj *domo*); *facilanima* estas trielementa vorto (*facila* kaj *animo* kaj *a*); *senpovigi* estas kvarelementa vorto (*sen* kaj *povo* kaj *a* kaj *igi*).

antaŭa elemento sola, jen al ambaŭ antaŭaj elementoj kune. Ekzemploj:

1. **Duoblaj flankelementoj:** tipo (C-B)-A: *urbdoma*: (urb-dom)-(a): apartena al urbdomo; *leonkora*: (leon-kor)-(a): karakterizata de leonkoro. Same kiel ĉe *vaporŝip-asocio*.

2. **Duoblaj ĉefelementoj:** tipo (C)-(B-A): *voĉdono*: (voĉ)-(don-o): dono de voĉo; *sangruĝo*: (sang)-(ruĝ-o): ruĝo de sango. Same kiel ĉe *aŭto-aerbrems*o.

Ni havas do la analogajn triojn:

(vapor-ŝip)-(asocio)	(aŭto)-(aer-brems)
(fer-voj)-(isto)	(kest)-(ŝlos-ilo)
(leon-kor)-(a)	(voĉ)-(don-o).

KUNTENAJ FLANKELEMENTOJ

302

En la supraj ekzemploj pri duoblaj flankelementoj, la ĉefelemento (vorto, sufiksoido, finaĵo) rilatas al tia vortkuno, kiu estas analizebla laŭ la vortefikaj reguloj, do povas formi memstaran vortkunmeton (vaporŝipo, urbdomo, leonkoro, kudrilo ktp.). Tiajn duoblajn flank-elementojn ni nomas **flankelementoj kuntenaj**.

Tia kuntena flankelemento ni povas rigardi ankaŭ radikon verban kun antaŭa elemento rilatanta al ĝi:

1. adverbe: *pafmurdo*: (pafmurdi)-(o); *bonfarto*: (bonfarti)-(o); *preteriro*: (preteriri)-(o). La interparenteza elemento estas plu analizebla: (pafe murdi), (bone farti), (pretere iri);

2. kiel predikata adjektivo: *beligo*: (beligi)-(o); *purigo*: (purigi)-(o). La interparenteza flankelemento estas plu analizebla: (bela igi), (pura igi).

La analizo de la supraj formoj do ne estas *pafa murdo*, *bona farto*, *pretera iro*, nek *pura igo*, *bela igo*, sed: (*pafmurdi*), (*beligi*)o. La o-finaĵo substantivigas la *nomon* de la ago esprimita de tiuj du flankelementoj kune.

Tio signifas, ke, se oni faris duelementan kunmeton laŭ la vortefikaj reguloj, tiun kunmeton oni povas pluformi finaĵe kiel unu tuton, do kvazaŭ radikvorton. Ekz-e: *domkonstruo* (*konstruo de domo*) estas pluformebla:

domkonstrua: (domkonstruo)-a: karakterizata de domkonstruo;

domkonstrue: (domkonstruo)-e: karakterizate de domkonstruo;

domkonstrui: (domkonstruo)-e-i: (ag)i domkonstrue.

Same: *purigi* (igi pura) estas pluformebla:

purigo: (purigi)-o;

puriga: (purigi)-o-a: karakterizata de purigo;

purige: (purigi)-o-e: karakterizate de purigo.

Kiel oni vidas el la supraj ekzemploj, la a-finaĵo same substantivigas antaŭ si la verbfinaĵan kunmeton (*purigi*) kiel la verbradikon (*ekz-e bati*). *Bata* estas *bat-o-a*, *puriga* estas *purig-o-a*.

Tiuj finaĵaj pluformadoj do donas konstruojn analogajn al la malsam-elementaj vortoj (vd. § 279), kun la diferenco, ke la finaĵo gluiĝas ne al

malsamelementa radikoj, sed al tuta kunmeto. Sed el tio sekvas, ke tiujn pluformaĵojn oni ne povas tiel analizi, kvazaŭ la finaĵoj apartenus nur al la lasta radik-elemento de la kunmeto: *domkonstrua*, ekz-e, ne estas analizebla kiel *konstrua je domo* (laŭ VER. II.), ĉar la a-finaĵo apartenas ne al *konstru*, sed al la tuta komplekso *domkonstru*. Pri la analizo de *domkonstrui*, kiu estas pli komplikita kunmeto, ni traktos poste (vd. § 306).

DISFALAJ FLANKELEMENTOJ

303

La ĉefelemento povas rilati ne nur al flankelementoj kuntenaj, sed ankaŭ al tiaj, kiuj memstare ne povas stari kune, sed kiujn nur la ĉefelemento kunkroĉas en unu vortkunmeton. Tiajn duoblajn flankelementojn ni nomas **flankelementoj disfalaj**.

Ekzemple: *samideano*: (sam/ideo)-(ano): (sama ideo)-(ano): ano de la sama ideo; *altmontaro*: (alt/mont)-(aro): (altaj montoj)-(aro): aro de altaj montoj; *facilanimeco*: (facil/anim)-(eco): (facila animo)-(eco): eco de facila animo.

La samajn disfalajn ĉefelementojn ni povas observi ankaŭ ĉe finaj ĉefelemento. Ekzemple:

facilanima: (facil/anim)-(a): (facila animo)-(a): karakterizita de facila animo; *blankĉapelo*: (blank/ĉapel)-(a): (blanka ĉapelo)-(a): karakterizita de blanka ĉapelo; *senkoro*: (sen/kor)-(a): (sen koro)-(a): karakterizita de eco (sen koro). Same, *bonfarta* ne estas *farta je bono*, ĉar la a-finaĵo rilatas ne al *fart*, sed al la tuta komplekso *bonfart*.

Ĝuste tio, ke la ordinara analizo ne donas sunchavan rezulton, montras ĉe tiuj formoj, ke la finaĵo estas memstara ĉefelemento. En tiaj okazoj do oni devas ĝin memstarigi, kaj al la tuta antaŭa komplekso oni devas doni tiun finaĵon, kiun postulas tie la vortefiko de la memstara finaĵo.

Voĉdoni estus, laŭ VER. III., *voĉe doni*. Tio evidente ne donas la deziratan sencon. Oni do memstarigu la i-finaĵon:

(*voĉdon*)-i.

La i-finaĵo postulas antaŭan adverbbon:

(*voĉdon*)-e-i.

La e-finaĵo postulas antaŭan substantivon:

(*voĉdono*)-e-i.

Per tiu formo ni ricevis la deziratan sencon:

funkcii (i-finaĵo) *per* (e-finaĵo) *voĉdono*

(ag)-i (per)-e (de) *voĉdono*.

Tiel, kvazaŭ aŭtomate, ni eksciis, ke la origina kunmeto, kies pluformado estas la i-finaĵa formo, estas la substantiv-ĉefelementa vorto:

voĉdono (dono de voĉo).

Same: *bonfarto* estus, laŭ VER. I. *farto de bono*. Tio estas sensenca. Oni devas do memstarigi la finaĵon:

(*bonfart*)-o.

La o-finaĵo do substantivigas la parentezan komplekson kiel unu tuton.

Se nun ni serĉas, kiel rilatas inter si la du parentezaj elementoj, ni trovas, ke *fart* estas verba radiko, do ĝi postulas antaŭan adverbcon. Tiel ni ricevas:

(*bone farti*)-o: stato bone farti.

El ĉi tiu esploro klariĝas, kial oni diras ofte *bonfarto*, sed neniam oni diras *bonpano*. Nome, ĉi lasta estas analizebla nur kiel *bona pano*, kaj tio estas kontraŭa al VER. I. Male, *bonfarto* estas analizebla laŭ la supre montrita ĉirkaŭvojo, do ĝi ne rompas la vortefikajn regulojn.

Kiel ni vidas, disfalaj flankelementoj alprenas ĉe la analizo finaĵon konforman al sia gramatika radikkaraktero (adjektiva radiko a-finaĵon aŭ e-finaĵon, substantiva radiko o-finaĵon) kaj poste rilatas inter si kiel du memstaraj vortoj. Prepozicio restas en sia prepozicia funkcio, se ĝi estas maldekstra flankelemento.

Rim. Do la vortefikaj reguloj estas devigaj nur ĉe tiuj kunmetoj, kies elementoj interkroĉiĝas proprapove. Se tiujn elementojn interkroĉas kroma elemento (finaĵa aŭ sufiksoida ĉefelemento), ili povas interkroĉiĝi dumaniere:

- a) inter ili povas validi la vortefikaj reguloj (vd. § 302): kuntenaj flankelementoj;
b) inter ili povas validi la sintaksaj reguloj de la determino: disfalaj flankelementoj.

INVERSA VORTEFIKO

Ekzistas disfalaj flankelementoj, kiuj ne povas alpreni, kiel memstaraj vortoj, finaĵon konforman al la gramatika radikkaraktero, ĉar tiel ili ne povus sintakse rilati inter si. Ekzemple:

senforta, *grandkuraĝa* disfalas en: (*sen forta*)a, (*granda kuraĝa*)a, kio ne estas ebla gramatike, ĉar nek prepozicio nek adjektivo povas rilati al adjektivo.

Tiaokaze ĉiam la unua flankelemento konservas sian gramatikan karakteron kaj difinas per tio la gramatikan vortkarakteron de la dua elemento. Ĉar prepozicio kaj adjektivo rilatas regule al substantivo, *sen* kaj *granda* substantivigas la duajn elementojn *fort* kaj *kuraĝ*. La analizo do estas: (sen forto)-(a): karakterizita de (sen forto); (granda kuraĝo)-(a): karakterizita de granda kuraĝo.

Ĉar ĉi-okaze la vortefiko iras de maldekstre al dekstre, do kontraŭdirekte al la normala, rekta vortefiko, ĉi tiun vortefikon ni nomas **vortefiko inversa**.

Rim. I. Tian inversan vortefikon ni povas vidi ankaŭ ĉe radikkunmetoj. Ekzemple ni rigardu la vorton *rapidmezurilo*. Ĝi estas dusenca. Oni povas ĝin analizi laŭ duobla ĉefelemento: (rapid) ← (mezur-ilo): (rapido) ← (mezur-ilo): mezurilo de rapid(ec)o; kaj laŭ duobla flankelemento: (rapid-mezur)-(ilo): (rapide ← mezuri)-(ilo): ilo de rapida mezur(ad)o. Sed se mi diras: *rapido-mezurilo*, aŭ *rapidecmezurilo*, per tio mi neprigas la unuan analizon (rapido) ← (mezurilo), dum dirante *tujmezurilo*, *subitmezurilo*, per la adverba unua flankelemento mi neprigas la duan: (tuj → mezuri)-(ilo): ilo por (tuj mezuri), ĉar adverbo postulas por si verban elementon (inversa VER. III. 1.).

Rim. II. De tiaj efikoj, sekrete efikantaj en la interno de vortoj, troviĝas ankoraŭ alia speco.

En la vorto *meblaro*, la sufikso *aro* postulas antaŭan substantivon pluralan: *meblaro* estas *aro de mebloj*. Same: *homamaso*: *amaso de homoj*. Ĉi tio estas *pluraliga vortefiko rekta*, ĉar ĝi iras de dekstre al maldekstre.

Nun ni rigardu la vorton *interkontinenta*. Ĝi estas kunmeto kun disfalaj flank-elementoj: (inter kontinento)-(a). Sed la prepozicio *inter* postulas post si pluralon, ĉar io povas troviĝi nur inter almenaŭ du objektoj. La analizo do estos: (inter → kontinento-j)-a. Ĉi tie do ni havas *pluraligan vortefikon inversan*, irantan de maldekstre al dekstre.

La du specoj de vortefiko estas tute analogaj. Unu substantivigas, la alia pluraligas la post ĝi troviĝantan vortelementon.

Rim. III. Ĉi tiu inversa substantiviga vortefiko estas tre grava, ĉar ĝi superfluigas specialan substantivigitan sufikson. *Senforta*, *sencerta*, *senutila* estus vortoj malbonaj, ĉar nenio en tiuj vortoj signas la substantiviĝon de la adjektivaj elementoj *fort*, *cert*, *util*. Sed *sen*, ĝuste per tio, ke ĝi povas stari nur antaŭ substantivo, logike substantivigas post si la adjektivajn elementojn. Ĝi do, per sia vortefiko inversa, anstataŭas substantivigan sufikson. Same *adjektivo*, ĉar ĝi povas rilati nur al substantivo, efikas substantivige kiel maldekstra flankelemento. En *senforta* kaj *grandkuraĝa* do la vortlogiko kreas substantivan elementon post *fort* kaj *kuraĝ*, neprigante la jenan vortstrukturon: *senfort(o)a*, *grandkuraĝ(o)a*.

ELEMENTOJ LATENTAJ

305

Per la vortefikoj rekta kaj inversa, do, inter la *videblaj* elementoj de vortkunmeto povas estiĝi elementoj *nevideblaj*, kiuj funkcias kaŝe en la interno de la kunmetaĵo. Tiujn elementojn, kiujn malkaŝas nur la analizo, oni povas nomi *elementoj latentaj*.

Tiaj latentaj elementoj estas ekzemple en *marteli* (martel[e]li) la finaĵo *e*; en *skriba* (skrib[o]a) la finaĵo *o*; en *homamaso* (hom[o]j]amaso) kaj *interkontinenta* (inter kontinento[j]a) la pluralsigno *j*.

Analizante la vorton *senkora* ni ĝin dismetas je (*sen koro*)a. Sed *a* kiel adjektiva ĉefelemento substantivigas la antaŭan elementon. Tiu substantivigo ne koncernas la elementon *kor*, ĉar *-a* ne rilatas al ĝi *sola*, sed al ambaŭ disfalaj flankelementoj (sen koro) *kune*. Do, se ni *signas* la substantivigan vortefikon per latentaj *o*-finaĵo, tiu *o*-finaĵo ne estos pleonasma apud la substantiva radiko *kor*, sed *o*-finaĵo proprafunkcia apud la komplekso (sen koro). Oni do devas ĝin signi jene:

(sen koro)-o←a.

Ĉar "esti sen koro" signas *econ*, la senco de la latentaj *o*-finaĵo estas ĉi-okaze *eco*. Ni ricevas do la jenan analizon:

(sen koro)-eco-(a): karakterizata de eco (sen koro): karakterizata de senkoreco.

Same: *ĉirkaŭurba*: (ĉirkaŭ urbo)-o←a: (ĉirkaŭ urbo)-eco-(a): karakterizata de eco [situo] (ĉirkaŭ urbo): karakterizata de ĉirkaŭurbeco.

Same: *senforta*: (sen→forto)-o←a: karakterizata de senforteco.

Same: *senpova*: (sen→povo)-o←a: (sen povo)-eco-(a): karakterizata de senpoveco.

FINAĴOJ PSEŬDOPLEONASMAJ

En *senforta*, *grandkuraĝa* kaj en similaj kunmetoj, la a-finaĵo ŝajnas pleonasma unuavide, ĉar ĝi ŝajnas kroĉiĝi al la adjektivaj radikoj *fort* kaj *kuraĝ*. Sed, kiel ni vidis, per la inversa vortefiko de la unua flankelemento ĝi ricevas propran funkcion, kaj rilatas al ambaŭ flankelementoj kune, kiel memstara elemento. Tiaokaze ni parolas pri finaĵoj *pseŭdopleonasmaj*, kaj pri la *memstariga efiko* de la unua flankelemento.

*

Por komprenigi ĉi tiun memstarigan efikon, ni vidu analoge la vorton *centjaro*. Ĝi estas kunmetita el la du elementoj *cent* kaj *jaro*. Sed *cent* ne povas rilati al *jaro* (singulara), ĉar ĝi postulas post si pluralon. Ĝi do kvazaŭ forpuŝas, memstarigas la o-finaĵon. La analizo do estas: (cent jar)-(o). *Cent* kaj *jaro* estas disfalaj flankelementoj, ĉe ili validiĝas la efiko de la unua elemento (*cent*), kiu kroĉas al la elemento *jaro* la latentan pluralfinaĵon. La plena analizo de la vorto do estas: (cent →jaro-j)o: daŭro (cent jaroj). Aliaj ekzemploj: *trimasto*, *tridento*, *deksilabo*, *triangulo*, *tripiedo*. Pri ilia analizo vd. § 314, 3. Rim.

Tute same estas ĉe *senforta*. En ĝi *sen* ne povas rilati al la adjektivo *forta*, ĉar ĝi postulas postan substantivon. Per sia substantiviga efiko ĝi do kvazaŭ forpuŝas, memstarigas la a-finaĵon: (sen fort)a. Kaj al la adjektiva radiko *fort* ĝi kroĉas la latentan o-finaĵon: (sen→fort-o)a. Do, ĝuste per tio, ke ĝi postulas postan substantivon, ĝi anstataŭas substantivigan sufikson.

Egale estas ĉe *grandkuraĝa*. Tie la memstarigon de la a-finaĵo faras la adjektivo *granda*, kiu postulas postan substantivon. Analizo: (granda →kuraĝ-o)a.

Per tia memstarigo ni povas klarigi ankaŭ la vorton *senpovo*. En ĝi la o-finaĵo ja ne estas pleonasma, sed ĝi ŝajnas rilati al la verba radiko *pov*. Tamen, ĉar prepozicio ne povas gluiĝi al la substantivo, al kiu ĝi rilatas, tia analizo estas neebla. Tiu ĉi neebleco memstarigas la o-finaĵon, kaj rilatigas ĝin al la disfalaj flankelementoj (sen povo). La analizo do estas: (sen povo)o: eco (sen povo): *senpoveco*.

Same estas ĉe *domkonstrui*. Tie la i-finaĵo ne estas pleonasma apud la verba radiko *konstru*, ĉar se oni analizus la vorton kun la verba ĉefelemento *konstrui*, laŭ VER. oni ne havus senchavan rezulton. La nesukceso de la ordinara analizo montras pri memstarigita i-finaĵo. Tiun memstarigon tie ĉi faras tio, ke *dom* estas la objekto de la ago konstrui; kaj la objekto povas esti esprimita nek per adverbo, nek per predikata adjektivo, sed *nur* per suplemento (DE). *Dom* do devas esti ligita per *DE* kaj *DE* povas stari nur inter du substantivoj. Do *konstru* devas alpreni substantivan formon: *domkonstruo*. La tiel estiĝinta latentata o-

finajo memstarigas la i-finaĵon: (domkonstruo)-i. La strukturo de la vorto do estos:

(dom→konstru-o)-e+i

domkonstrue-i = (ag)i domkonstrue

Tiel same:

voĉdoni = (ag)i voĉdone t.e. per dono de voĉo;

leterskribi = (ag)i leterskribe aŭ per skribo de letero.

Rim. Pluraj, laste ankaŭ de Hoog, klarigus alimaniere tiajn kunmetojn. Ili analizus jene:

leterskribi = *skribi leteron*;

t.e. krom VER. III. 1. kaj 2., ili allasus ankaŭ trian vortefikon de la verba ĉef-elemento: ag-objektigan. Tio ŝajnas plaĉa unuavide kaj multe pli simpla ol la analizo montrita de ni.

Sed ĝuste tiu troa simpleco estas suspektinda: ĝi ne kongruas kun la malofteco de tiatipaj kunmetoj. Se nome ni starigas agobjektan analizon kiel unuagradan, tio signifas, ke tiajn kunmetojn oni faras regule, kutime, amase. La fakto tamen estas, ke tiaj vortkonstruaĵoj estas tre sporadaj: el ili uziĝas ĝenerale nur kelkaj "ŝtoniĝintaj": *voĉdoni*, *fiŝkapti*. Sed oni ne diras: *li bruaŭdis*, *birdvidis*, *horloĝaĉetis*, *poemforgesis*, *cirkrigardis*, *lernejvizitis*, *leterricevis*, en kiuj la laŭsenca analizo estus farata per memstara agobjekto: *li aŭdis bruon*.

Jam ĉi tio montras, ke la sporadaj objekto-verbaj kunmetoj ne estas simple identaj kun la grupo verbo + agobjekto. Kaj efektive, oni povas diri: *mi leterskribis dum la tuta posttagmezo*, tamen oni ne diras: "mi leterskribis al vi", sed ja "mi skribis al vi leteron". Same: *li almozpetas ĉe la stratangulo*, sed "li petis de mi almozon"; *la akvoportisto iris akvoporti*, sed "portu al mi akvon"; *domdetruui estas pli facile ol domkonstrui*, sed "la bombo detruis domon"; *en Japanio oni iras ĉerizflorigardi*, sed "la knabino rigardas ĉerizfloron". Fiŝkaptisto, sukcese *fiŝkaptinte*, diros: "Mi kaptis fiŝon!".

La diferenco nun jam estas evidenta. La memstara agobjekto (*skribi leteron*) estas tiel same emfazata, kiel la verbo mem, ĝi havas propran individuan ekziston (difinitan aŭ ne), ĝi estas io konkreta, kiun la subjekto per sia verbo rekte sensas, produktas aŭ trafas. Per sia konkreteco ĝi ankaŭ reagas al la ago kaj striktigas ties limojn je aktuala faro. Tia estas la okazo en la ĉi-supre listigitaj vortkunmetoj: ilia objekto ne povas do sinteziĝi kaj tial ili neniam estas uzataj. Male estas ĉe la flankelementa agobjekto (ekz-e en "*leterskribi*"): ĝi estas sen individua ekzisto, estas kvazaŭ abstrakta, plu ne la rekta trafo-celo de la verbo, sed nur ties karakterizaĵo. Ne superflua certe, sed ombrata: el memstara struktura frazelemento ĝi degradiĝas je karakterizilo. Manke de konkreteco, ĝi ne povas limigi aktuala la agon, do ĉi tiu etendiĝas en ian ĝeneralecon, dum la eksobjekto, staranta modeste flanke, kvalifikas nur ĝian specialecon en simpla rolo de suplemento. Fakte *li leterskribis*, *almozpetis*, *akvoportis* signifas ne certan agon, sed tion, ke li okupiĝis per skribo de leteroj, peto de almozo, porto de akvo. Sed tio ja estas nia propono de analizo: (ag)i leterskribe aŭ per skribo de letero. Sekve, kiel ajn alloge estus elekti la pli simplan analizon, la vera senco de tiaj vortoj postulas la analizon pli komplikitan.

Kompreneble, anstataŭ la sintezaj formoj oni ĉiam povas uzi la analizajn: *mi skribis leterojn*. Sed anstataŭ la analizaj, oni povas apliki la sintezajn nur tiam, kiam ne temas pri ago aktualigita per konkreta objekto.

KLARIGO DE L' INVERSA VORTEFIKO

307

Oni vidis, ke la ordinara rekta vortefiko direktiĝas de dekstre al maldekstre, sed ekzistas ankaŭ vortefiko escepta, kiu direktiĝas inverse, de maldekstre al dekstre. La kaŭzon de ĉi tiu escepta vortefiko malkaŝas al ni la esploro de la strukturo de tiaj inversefikaj vortoj.

Ni esploru, kio okazos, se ni ordos la elementojn konforme al la ordinara vortefiko, tio estas, ni inversigos ilian vicordon, metante la maldekstran elementon dekstren.

Por ekzemplo, ni prenu la vorton *senforta*. Ĝi konsistas el proprafunkcia a-finaĵo kaj el la disfalaj flankelementoj *sen* kaj *fort*: (sen/fort)a. Inversigante la disfalajn flankelementojn, ni ricevas la formon: (fort/sen)a: *fortsena*. Analizante tiun ĉi vorton, ni ricevas senchavan rezulton laŭ VER. II. *Fortsen*a: sena je forto.

Same: *sendependa*: dependo-sena: sena je dependo; *sendependo*: dependenseno: sen(ec)o de dependo; *porvivo*: vivpor(aĵ)o: poraĵo de vivo; *perlabori*: laborperi: labore peri (al si); *facilanim*o: animfacilo; facil(ec)o de animo; *grandkuraĝa*: kuraĝgranda: granda je kuraĝo.

Per tio ni vidas

1) ke la lingvouzo en tiaj vortoj inversigis la vicordon de la elementoj, per tio do inversiĝis ankaŭ la vortefiko;

2) ke ĉesigante la inverson, ni ricevas duoblajn ĉefelementojn, do el (C/B)a fariĝas (B)-(Ca). La a-finaĵo do propre apartenas en inversefikaj vortoj al la *maldekstra* elemento. La dekstra elemento estas kvazaŭ intermetita. Tute bone estas do kompreneble, ke pro tiu intermetita elemento memstariĝas la finaĵo. La kunapartenaj maldekstra elemento kaj la memstara finaĵo kvazaŭ transportas la mezan dekstran elementon. La strukturo de tiaj vortoj do estas:

sen(fort)a sen(pov)o ĉirkaŭ(urb)a

C. PLI-OL-TRIELEMENTAJ KUNMETOJ

308

La strukturo de la pli-ol-trielementaj vortoj ne prezentas specialan malfacilaĵon, ĉar ili ja estas redukteblaj en vortojn *dukompleksajn*, kies kompleksoj siavice estas plu analizeblaj ĝis la plena dissolvo de la kunmeto. El la du kompleksoj la dekstra estas la *ĉefkomplekso*, la maldekstra estas la *flankkomplekso*. Ekzemple en *vagonar-haltigilo* la ĉefkomplekso estas *halt-ig-ilo*, la flankkomplekso estas *vagon-ar*. La ĉefkomplekso povas esti ankaŭ unuelementa; tiam ni parolas pri *ĉefmembro*. Tiu ĉefmembro povas esti ankaŭ finaĵo. Ekzemple: *instruistina* estas dismetebla en la ĉefmembron *-a* kaj en la trielementan flankkomplekson *instru-ist-in*.

Laŭ la konstruo de la flankkomplekso, oni povas dividi la pli-ol-trielementajn vortojn en tri specojn:

1. La flankkomplekso estas vortkunmetaĵo farita laŭ la reguloj de VER.,

aŭ laŭ la reguloj regantaj en la trielementaj vortoj. Tiajn ni nomas **flankkompleksoj kuntenaj**.

Plej gravaj el tiuj ĉi kunmetaĵoj estas tiuj, kies ĉefmembro estas *igi* aŭ *iĝi*, kaj kies flankkomplekso kuntena havas la ĉefelementon *-a*, kaj, kiel maldekstran flankelementon, prepozicion: (xCo)a-(igi). Ekzemploj: *enpoŝigi*: en (poŝ)-a igi; *altabliĝi*: al (tabl)-a iĝi; *subakvigi*, *devojiĝi*, *envagonigi*, *senhaŭtigi*, *sensentigi*: sen[sent-o]-a igi; *endormigi*, *sendevigi*, *senkulpigi*, *senfortigi* (igi aŭ iĝi enpoŝa, altabla, subakva, devoja, envagona, senhaŭta, sensenta, endorma, sendeva, senkulpa, senforta).

2. La flankkomplekso konsistas el elementoj, kiuj ne povus formi memstaran kunmeton, kiujn do kunkroĉas sole la ĉefmembro. Tiuj estas la **flankkompleksoj disfalaj**.

Plej gravaj el tiuj ĉi kunmetaĵoj estas tiuj, kies flankkomplekso konsistas el du substantivoj rilatantaj inter si per prepozicio. Ekzemploj: *vizaĝaltere* (vizaĝo al tero)-(e); salto *kapalmura*: (kapo al muro)-(a); batalo *korpsurkorpa*: (korpo sur korpo)-(a); *vidalvide*.

3. La flankkomplekso havas ĉefelementon latentan, kiu siavice estas ĉefmembro de pli-ol-trielementa kunmeto. Tiaokaze oni parolas pri **flankkomplekso kadra**. Ekzemploj: *enpoŝigo*: (enpoŝa+igi)-o; *sensentiĝo*: (sensenta+iĝi)-o; *vizaĝalteri*: [(vizaĝo al tero)-o+e]-i.

La latentaj ĉefelementoj de la flankkomplekso povas esti antaŭata de elemento, kiu siavice estas ĉefmembro de pli-ol-trielementa vortkunmeto. Tion oni povas nomi plurkadra flankkomplekso. Ekzemple: *senkulpiga*: [(senkulpa+igi)-o]-a; *vizaĝalteriga*: [(vizaĝo al tero)-a]-iĝi]-o]-a.

Rim. Precipe la lastaj ekzemploj montras bone la funkcion de la latentaj finaĵoj, estigitaj de la vortefiko rekta kaj inversa en la interno de la vorto. Kiel ajn komplikita ŝajnas la strukturo de la plurkadraj kunmetoj, ilia klarigo estas farebla nur tiamaniere. Ke oni tamen ne sentas tiun komplikecon dum la uzo de la lingvo, tio estas bone klarigebla: oni ja ne sintezas tiujn vortojn konscie, sed parte simple lernas ilin kun ilia senco, parte oni faras ilin, senkonscie pri la strukturo, laŭ la analogio de similaj, lernitaj, kunmetoj.

D. KONSERVO DE FINAĴOJ

309

Inter la elementoj de vortkunmeto la finaĵo povas esti ellasita. Ĝin ja markas aŭ la radika karaktero de la elemento, aŭ (se la elemento funkcias kiel vorto nekonforma al la radikarkaraktero) la vortefiko de la ĉefelemento. Ekzemple en *varmenergio* la vortefiko de la substantiva ĉefelemento *energio* metas o-finaĵon al la adjektiva radiko *varm* (varmo-energio). En *sensentigi* la predikatitiva vortefiko de la verba ĉefelemento *igi* metas a-finaĵon al la komplekso (sen sent) kaj la inversa vortefiko de la prepozicio *sen* metas o-finaĵon al la verba radiko *sent*, do la vortefiko klare evidentiĝas la strukturon: (sen→sent-o)-a-igi.

Tamen, oni plurfoje konservas la finaĵon de la flankelemento. Tio povas okazi el tri motivoj:

1) por belsoneco, se la ellaso de la finaĵo estigus malfacile prononc-eblajn konsonantkambolojn; ekzemple: *majstroverko*, *arbobranĉo*, *kudromaŝino*. Zamenhof ordinare konservis la finaĵon, kiam ties forigo okazigus renkonton de nur du konsonantoj, se ilia kunprononco estus iom konfuza — precipe en la du jenaj okazoj:

a) kiam la unua estas voĉa kaj la dua senvoĉa (aŭ reciproke): bp (skriboportanta), fb (kafobabilan), vf (vivofonto, ŝafoviro), dt (ludotablo), bs, vs, ds, zs (pizosilikvoj), zk (rozokolora) ktp.

b) kiam la du konsonantoj estas samaj: pp (kapoparto), (rabobirdo), vv (vivovespero), ss (ĉasoservisto) ktp.

Iliajn detalojn vidu ĉe Prof. Kawasaki*. Laŭ la ĝenerala maniero oni el tio povas konstati, ke Z. pli konsideris la belsonecon kaj la tujkompreneblecon ol la koncizon;

2) por klareco, se la flankelemento estus malfacile rekonebla en senfinaĵa formo; ekzemple: *diosimila*, *luodomo*;

3) se la kunmeto ŝajnus havi alian sencon; ekzemple: *feokanto* (fekanto); *konkoludo* (konkludo); *viro-temo*: virtemo; *inoformo*: informo.

Ĉar neniu el la supraj tri motivoj povas troviĝi ĉe sufiksoidoj, antaŭ ili oni ne konservas la finaĵojn. Ties kaŭzo do estas ne ia esenca diferenco inter radikoj kaj sufiksoidoj sed simple superflueco, neneceso. Kiam neceso tamen ekzistas, oni konservas la finaĵon; tri ekzemplojn oni povas citi: *posteulo* (por diferencigi de *postulo*), *unuueco* (por diferencigi de *unueco*), *prezoinda* (por montri, ke tie ĉi ne funkcias la postverba karaktero de *inda*). Kvara ekzemplo estus la konservo de o-finaĵo antaŭ *igi* (proponita de Wüster) por montri substantivecon de adjektivradika flankelemento (*varmoigi*, *elektroigi*).

Finajaĵon apud finaĵo oni neniam konservas. Ĝuste por eviti tion oni havas ja la sufiksajn parelementojn (*eco* por *ao*, *ado* por *i-o*). La sola escepto estas *vivuo*² (*vivui* ktp.). Krome la (apenaŭ necesaj) vortoj *kelkea*, *multea*, por signi numeron (unua, dua, tria... deka... kelkea... multea).

Pri tio, kiun el la finaĵoj oni metu en okazo de neceso, orientas la jena regulo:

Inter la elementoj de kunmetita vorto oni metu tiun finaĵon, kiu estas tie la latentaj finaĵo estigita de vortefiko.

* Naokazu Kawasaki: Esperantologiaj Raportoj: N° 1 *Z-aj Ekzemploj*, 1936; N° 2 *Radiktipoj laŭ aranĝo de vokaloj kaj konsonantoj*, 1952; N° 3 *Dukonsonantaj kombinoj*, 1952; N° 4 *Trikonsonantaj kombinoj*, 1953 — ĉiuj ĉe la Fremdlingva Universitato de Osaka.

Ekzemploj:

1. **o-finaĵo:** *akvofalo, manĝoĉambro, montrofringro, vivopovo, devosento, vangobato* (VER. I.); *herboriĉa, artoplana, vivolaca, servopreta* (VER. II.). Pluformado de vortoj laŭ VER. I. estas: *fruktodona:* (fruktodono)-a; *gastoĉambra:* (gastoĉambro)-a; *libroforma:* (libroformo)-a; *ĝermoporta:* (ĝermoporto)-a; *fruktodoni:* (fruktodono)-e-i; *fingromontri:* (fingromontro)-e-i; *gardostari:* (gardostaro)-e-i. Pluformado de vortoj laŭ VER. II.: *vivolaci:* esti vivolaca; *servopreti:* esti servopreta.

Rim. I. En kunmeto postulanta analizon E. (substantiva epiteto), ofte ambaŭ substantivoj alprenas la akuzativan aŭ pluralan finaĵon. Tiam oni devas ĉiam uzi divid-strekon: *miaj esperantistoj-amikoj*; *la grandan verkiston-filozofon*. Ĉe kelkaj tre kutimaj tiaj kunmetoj tamen oni trovas tiujn finaĵojn nur ĉe la fino: *membro-abonantoj*. Ĉe la ceteraj analizoj (R. kaj M.) oni ne konservas la pluralsignon; tiarilataj provoj de Grabowski (*virinoj-ploro*; *trumpetoj-sono* ktp.) ne estis imitataj, malgraŭ la Z-a *libroj-rimeno*.

2. **a-finaĵo:** ĝin oni metas, se la belsoneco postulas, post disfala maldekstra flankelemento adjektiva: *kurbakrura:* (kurba kruro)-a; *dubasenca:* (duba senco)-a; *longapenta:* (longa pento)-a; *longa-kola:* (longa kolo)-a.

Rim. II. Vortoj kiel *dubesenca, longekola* ktp. estas malĝustaj, ĉar en ili la maldekstra flankelemento rilatas ne al la adjektiva ĉefelemento (-a) sed al la substantiva dekstra flankelemento (senco, kolo). Ĉar al substantivo povas rilati nur adjektivo, en tiuj vortoj oni devas meti a-finaĵon, konforme al la strukturo: (duba senco)-a; (longa kolo)-a. Pri la esceptaj *multe-kunmetoj*, vd. malsupre sub punkto 3.

Konservenda estas la a-finaĵo inter du adjektivoj kunskribitaj, rilatantaj ambaŭ senpere al la sama substantivo kiel ties epitetoj: *germana-rusa* vortaro; *ruĝa-blanka-blua* standardo; *ira-reira* bileto. Pri la akordiĝo vd. § 128. Rim. III.

3. **e-finaĵo:** povas esti metita al adverba flankelemento: *supreteni*; *minute-bakita*^z = (minute baki)-ita; *pote-kreskigita*^z; *altdevena*^z = (alte deveni)-o-a. En ĉi lasta okazo pli simple analizigus *altdevena* = (alta deveno)-a. La adverba flankelemento, kun konservita finaĵo, povas signi la ag-adjekton: *desegne-kovrita*^z, *larne-lacigitaj okuloj*^z; tamen oni povas uzi ĉi-okaze la o-finaĵon, t.e. lasi la e-finaĵon latentan: *desegnokovrita, larmolacigita*.

Krome oni trovas konservitan e-finaĵon ĉe adverbo kunskribita per ligostreko kun la adjektivo rilatata: *ore-purpura, komune-homa*, kaj ĉe adverboj apudmetitaj: *trafe-maltrafe*.

La prepozicioj ligiĝas senpere: *postfesta, intergenta*; escepta estas *postesigno*^z (Kp. *posteulo*). Pri *kune-* vd. § 391.

La finaĵo *n*, signanta almovon, regule persistas ĉe adverboj: *antaŭeniri, antaŭenpuŝi, flankeniri, flankenjetiĝi; hejmenreveno; malsuprenflugo, malsupreniri, malsuprenĵeti* ktp., sed antaŭ *iĝi* kaj *igi* oni trovas ĝin nur en *supreniĝi* (ascendi), *malsupreniĝi* (descendi) kaj *antaŭeniĝi* (avanci);

cetere oni uzas prepoziciajn prefiksoidojn: *deflankigi*^Z (ne: flankeniĝi!), *alfundiĝi* (ne: fundeniĝi!). Tiel same oni procedas ĉe finaĵa pluformado: *alsupra* (ne: suprena!). Ĉe prepozicioj oni ĉiam ellasas la finaĵon **n**: *suriri*, *subiri*, *eniri*, kelkfoje eĉ ĉe substantiva flankelemento: *ĉieliro*.

Speciala okazo estas pri *multe*, kiu, en tiu ĉi adverba formo, estas rigardata kaj uzata kvazaŭ nevaria numeralo: *multebranĉa*, *multefoje*, *multejara*, *multekolora*, *multekosta*, *multepinta*, *multescia*, *multevortulo* (ĉiuj zamenhofaj). Tamen oni povas diri ankaŭ *multascia*, *multataga*^Z, *multalingvulo*^Z. Kelkfoje ĉe **Z**. mankas la intera vokalo: *multflanka*, *multmana*, *multsenca* k.s. ne tre belsonaj vortoj; eble preferindaj estus: *plurflanka*, *plursenca*. Male, la flankelemento *kelk* estis uzata de **Z**. ĉiam kun adjektiva finaĵo: *kelkafoje*, *kelkavante*.

4. **i-finaĵo** propre neniam povas esti metita antaŭ flankelemento, ĉar vortefiko neniam postulas antaŭan verbon. Tamen oni trovas kelkajn tiajn kunmetojn: *vivipova*, *plaĉivola*, *pagideva*. En ili la verboj **povi**, **voli**, **devi** postulas infinitivon, kaj tiu ĉi sintaksa efiko povas esti pli forta ol la vortefiko. Ĉi lasta postulus la formojn *vivopova*: (vivopovo)-a; *plaĉovola*: (plaĉovolo)-a; *pagodeva*: (pagodevo)-a; do adjektivigitajn kuntenajn flankelementojn laŭ la skemo (C-B)-a. Sed la *sintaksa efiko* eldeigas la suprajn formojn laŭ la analizo (vivi←povi)-o←a; (plaĉi←voli)-o←a; (pagi←devi)-o←a; do, *karakterizata* (a-finaĵo) *de ago* (o-finaĵo), (*vivi povi*), (*plaĉi voli*), (*pagi devi*).

E. ESCEPTOJ

Laŭ la ĝis nun pritraktitaj reguloj estas klarigebla la strukturo de la E-aj vortkunmetoj. Pri tio, ke krome ekzistas ankaŭ *derivo*, pri kiu ne validas la reguloj, vd. § 275, 2; 408-431.

Formoj kiel *dormiĉambro*, *najlimaŝino* ktp. estis proponitaj, sed apenaŭ trovis aplikantojn. Ili estas nekonsilindaj. Anstataŭ la unua sufiĉas *dormo-ĉambro* (ĉambro de dormo), anstataŭ la dua oni diru *najladmaŝino* (maŝino de najlado).

Krom la *derivo*, oni trovas en la lingvouzo ankoraŭ du esceptojn el la vortkunmetaj reguloj:

1. La **sin**-kunmetojn (sinmortiga, sinfida), kiuj pli kaj pli ekradikis anstataŭ la originaj **mem**-kunmetoj (memmortiga, memfida). Nome, oni sentis la bezonon distingi inter la aktiva kaj pasiva formo de **mem**. La ĝusta formo estus propre *si* (simortigo, sifido); sed, sendube, la **sin**-formo estas pli belsona en kunmetoj kaj ankaŭ pli klara. Cetere, **sin** en tiu ĉi funkcio tute perdis sian originan sencon kaj akiris la sencon de *pasiva mem*. Tion montras, ke ĝin oni *devas* uzi ankaŭ por la unua kaj dua personoj (mia sinfido, via sinmortigo). La regulaj **sia**-kunmetoj, male, koncernas nur la trian personon (*miaflanke*, *viaflanke*, *siaflanke*). Kp. § 160.

Rim. Aliaj akuzativaj flankelementoj (*nenionfarado*, *ĉionvida*, *ĉionfaranto*) estas

simplaj eraroj. Oni devas diri: *neniofarado* aŭ *nenifaro*, *ĉiovida*, *ĉiofaranto*, kiel oni diras *ĉiopovo*, *ĉiopova*, *ĉioscio*, *ĉioscia*. Vd. § 314.

2. I-finaĵajn flankelementojn antaŭ **vola**, **pova**, **deva** (*vivivola*, *placivola*, *pagideva*). Tiuj formoj baziĝas sur speciala vortefiko, do estas plene regulaj kaj aprobeblaj (parte ankaŭ zamenhofaj). Kompreneble oni povas uzi ankaŭ la substantiv-flankelementajn formojn (*vivopova* ktp.). Pri la klarigo de tiuj ĉi formoj vd. § 309, 4.

F. RESUMO

311

A) Duelementaj vortkunmetoj estas farataj laŭ difinitaj leĝoj, nomataj vortefikaj (VER.). Laŭ ili la lasta (ĉefa) elemento de la kunmeto difinas (postulas aŭ estigas) la gramatikan vortkarakteron de la antaŭlasta. Substantivo kaj adjektivo, kiel ĉefelemento, postulas antaŭan substantivon; verbo postulas antaŭan adverbbon aŭ (sian) predikatan adjektivon. Vd. § 314.

B) En trielementaj kunmetoj oni trovas, ke:

I. La du dekstraj formas unu tuton analizeblan laŭ VER., kaj tiel rilatas (laŭ VER.) al la tria, plej maldekstra elemento (**duobla ĉefelemento**: *aŭto-aerbrems*; *pard-ŝlosilo*, *voĉdono*).

II. La plej dekstra elemento, sola, rilatas al la du maldekstraj elementoj formantaj unu tuton (**duobla flankelemento**). Tiaokaze ekzistas du eblaĵoj:

1) la duobla flankelemento estas analizebla laŭ VER. (**kuntenaj flank-elementoj**: *vaporŝip-asocio*, *kudril-ujo*, *purig-o*).

2) ĝi ne estas analizebla laŭ VER., do ne povas formi memstaran vortkunmeton (**disfalaj flankelementoj**). Tiaokaze ekzistas ree du eblaĵoj: a) la disfalintaj elementoj povas sintakse interrilati, alpreninte finaĵon konforman al ilia gramatika karaktero. Tiaokaze ili funkcias laŭ tiu sintaksa interrilato (adjektivo plus substantivo, prepozicio plus substantivo: *grandanim-eco*, *facilanim-a*, *senkor-a*);

b) ili ne povas sintakse interrilati (adjektivo plus adjektivo aŭ verbo; prepozicio plus adjektivo aŭ verbo). Tiaokaze la maldekstra flank-elemento (adjektivo aŭ prepozicio) substantivigas la dekstran flank-elementon, por povi veni kun ĝi en sintaksan interrilaton. Tion oni nomas **inversa vortefiko** (*grandkuraĝ-a*, *diverskonsist-a*, *senfort-a*, *senpov-a*).

Rim. La vortefiko, tiel la rekta, kiel la inversa, povas esti evidentigita per finaĵo (pura-igi, senforto-a). Tiujn finaĵojn, funkciajn kaŝe, nevideble, ni nomas **finaĵoj latentaj**.

C) Pli-ol-trielementaj vortkunmetoj povas havi:

I. Flankkomplekson **kuntenan**: *senhaŭt-igi*.

II. Flankkomplekson **disfalan**: *vizaĝalter-e*.

III. Flankkomplekson kadran: (*senhaŭt-ig*)-o, aŭ plurkadrano: (*senhaŭt-ig*)-o/-a.

2. EKZEMPLA DEMONSTRADO

En la du sekvantaj ĉapitroj ni montros la strukturon de la Esp-aj vortoj per ekzemploj, demonstrante ĝin laŭ du kontraŭaj vojoj: unue, sekante pretajn tipojn de kunmetaĵoj (*analizo*); due, konstruante el la mozaik-ŝtonoj de la elementoj pretajn vortbildojn (*sintezo*).

312

A. ANALIZO DE VORTOJ

313

Por ekscii la precizan sencon de vorto, oni devas ĝin analizi, tio estas, dismeti en ĝiajn elementojn kaj poste konstati la sencan interrilaton de la elementoj. Pri tio grandparte orientas jam la reguloj de la vortefiko, sed ili tamen lasas certan elastecon de senco. Tiun sencan oni povas diveni parte per la pesado de la elementoj mem, parte el la kunteksto.

Rim. I. En la praktiko plej ofte oni ne aplikas tian analizon, ĉar oni lernas la sencan de la diversaj kunmetoj kaj ĝin jam komprenas sen analizo. Tial nekutimaj kunmetoj, eĉ se ili estas ĝustaj, haltigas en la legado, kaj, se ili estas tro multaj, ili lacigas.

Ĉe la plurelementaj vortoj oni unue konstatas la grupiĝon. Ekzemple la vorton *aŭtoaerbrems* oni grupigas jene: *aŭto/aer-brems*: aerbrems de aŭto. Poste oni analizas la ankoraŭ ne dismetitan grupon kaj ĝin rilatigas al la solstarigita elemento. Do la vorton *aerbrems* oni dismetas jene: *brems de aero* kaj poste oni rilatigas: (*brems de aero*) de (*aŭto*). Nun oni konstatas la sencan interrilaton inter *brems* kaj *aero*, tio estas, oni pliprecizigas la elastan sencan de la rilatiga *de*. Ĉi tie ĝia senco estas *per*. La senco de la alia *de* estas *apartena al*. La analizo de la tuta vorto do estas: *brems per aero, apartena al aŭto*. — Same: *vaporŝip*asocio: vaporŝip-asocio: asocio de vaporŝipoj (*asocio*) de (*ŝipoj de vapor*): *asocio por ŝipoj (movataj) de vapor*.

La analizo de la plurvortaj kunmetoj kaj sufiksoidaj kunmetoj ĝenerale ne prezentas malfacilaĵojn. Pli komplikita estas la analizo de vortoj kun memstaraj finaĵoj.

Ĉe ilia analizo oni devas iri prove, de la plej simpla eblo al ebloj pli kaj pli komplikitaj. La garantio pri la ĝusteco de la analizo estas la *senchava rezulto*. Se ni akiras tian, la analizo estas finita. Se la pli simpla analizo ne donas rezulton senchavan, oni devas transiri al pli malsimpla analizo.

En la sekvantaj paragrafoj ni montras la sinsekvajn gradojn de analizo, pritraktante ilin laŭ la finaĵoj.

Pri la skemoj troveblaj inter la pritraktoj, oni atentu jenajn klarigojn:

La radik-elementoj estas signitaj per la litero R (radiko), aŭ per majuskloj, komencitaj de dekstre: C, B, A. Se la ĉefelemento estas finaĵo, ĝi estas signita per la sola finaĵo mem. C signas ordinare maldekstran, B dekstran flankelementon.

La gramatikan radikkarakteron ni signas per la respektiva finaĵo metita antaŭ la *majusklo*; ekzemple: aC signas adjektivradikan maldekstran

flankelementon; iB signas verbradikan dekstran flankelementon; oB signas substantiv-radikan dekstran flankelementon.

La vortkarakteron validan aŭ estigitan de vortefiko rekta aŭ inversa, ni signas per la respektiva finaĵo metita *post* la majusklo. Prepozicion ni signas per *x*. Ekzemple: *Cx* signas prepozicion kiel maldekstran flankelementon; *aCa* signifas, ke adjektivradika maldekstra flankelemento funkcias en adjektiva formo; *aCo* signifas, ke adjektivradika maldekstra flankelemento funkcias en substantiva formo, *xCa* signifas, ke prepozicio (maldekstra flankelemento) iĝis adjektivfunkcia.

Elementojn kunapartenajn (duoblajn flankelementojn) ni signas per parentezo. Flankelementojn kuntenajn krome ni ligas per streko, disfalajn ni dividas per streko oblikva. Ekzemple:

kuntenaj flankelementoj: (C-B)

disfalaj flankelementoj: (C/B).

Se radikkaraktero ne estas signita, tio signifas, ke ĝi estas indiferenta.

La vortefikon ni signas per sagoj: la rektan per \leftarrow , la inversan per \rightarrow .

Ekzemple: (Cx/Bo)-o-a signifas: prepozicia maldekstra flankelemento, per kies inversa efiko ĉiaradika dekstra flankelemento substantiviga, formas kun tiu substantivigita dekstra flankelemento duoblan flankelementon disfalan antaŭ la proprafunkcia a-finaĵo, kiu, siavice, per sia vortefiko, substantivigas la duoblan flankelementon kiel unu tuton. Tia vorto estas ekzemple *senpova*: (sen pov-o)-o-a: *karakterizita* (a-finaĵo) *de eco* (o-finaĵo) (*sen povo*). Ĉar *pov* estas verba radiko, la kompleta skemo de *senpova* estas:

(Cx/ \rightarrow iB-o)-o \leftarrow a

(Por homo, kutimiĝinta al la matematika pensado, tiuj skemoj multe helpas en la analizo de vortoj. Sed ili *ne estas nepre necesaj* por komprenigi la analizon. Kiu ne emas aŭ ne kapablas ilin uzi, tiu rigardu ĉe la analizoj nur la abundajn ekzemplojn, kiuj lin pli facile orientos ol skemoj kaj reguloj).

O-finaĵaj vortoj

1. Unue oni provas analizon laŭ la simpla vortefika regulo (VER. I.), sen konsidero, ĉu la finaĵo estas pleonasma aŭ proprafunkcia.

Ekzemploj: *homkorpo* (korpo de homo); *varmenergio* (energio de varmo); *skribmaŝino* (maŝino de skribo); *orĉeno* (ĉeno el oro); *aktorino* (aktoro ino); *belajo* (belo aĵo); *beleco* (belo eco); *belulo* (belo ulo); *konstruado* (konstruo ado); *korpvarmo* (varmo de korpo); *ĉielbluo* (bluo de ĉielo); *voĉdono* (dono de voĉo); *leterskribo* (skribo de letero); *infanskribo* (skribo de infano); *ĉiopovo* (povo de ĉio); *ĉioscio* (scio de ĉio); *nenifaro* (faro de nenio); *memmortigo* (mortigo de [si] mem); *memfido* (fido de [si] mem). Kiel ni vidas, en tiaj okazoj la proprafunkciaj finaĵoj formas kun la antaŭa radiko duoblan ĉefelementon (vd. § 301).

2. Se la unuagrada analizo ne sukcesis, la finaĵo estas mem ĉefelemento kaj la antaŭa parto konsistas el duobla flankelemento. Ni do provas, ĉu

tiuj flankelementoj estas *kuntenaj*. Antaŭ o-finaĵo duoblaj flankelementoj povas troviĝi nur, se la dekstra elemento estas radike verba; ĉi-okaze la maldekstra flankelemento rilatas al ĝi adverbe, aŭ kiel predikata adjektivo. La analizo do estas:

(Ce←iBi)-o aŭ (Ca←iBi)-o

do la proprafunkcia o-finaĵo substantivigas la kuntenajn flankelementojn kiel tuton. Ekzemploj: *bonfarto*: (bone farti)-o; *bonodoro*: (bone odori)-o; *bonhumoro*: (bone humori)-o; *pafmurdo*: (pafe murdi)-o; *plenŝtopo*: (plena ŝtopi)-o; *mortpiko*: (morta piki)-o; *purigo* (pura iĝi)-o; *ŝtatigo* (ŝtata iĝi)-o; *manĝigo*: (manĝa iĝi)-o.

3. Se la duagrada analizo ne sukcesis, validas la *inversa* vortefiko: la maldekstra flankelemento (prepozicio aŭ adjektivo) kroĉas substantivan finaĵon latentan al la dekstra flankelemento, per tio memstarigas la originan o-finaĵon, eĉ se ĝi staras apud substantiva radiko (pseŭdopleonasmeco). La strukturo de la vorto do estas:

(Cx/→B-o)→o aŭ (Ca/→B-o)→o

La senco de la memstarigita o-finaĵo tiaokaze estas vortlogike *eco*, aŭ *aĵo*.

Ekzemploj: *facilanimo*: (facila→anim-o)→o: (facila animo)-eco: facilanimeco; *senpovo*: (sen→pov-o)→o: senpoveco; *senpretendo*: (sen→pretend-o)→o: senpretendeco; *senfaro*: (sen→far-o)→o: senfareco; *perlaboro*: (per→labor-o)→o: aĵo per laboro; *ĉirkaŭbrako*: (ĉirkaŭ→brak-o)→o: aĵo ĉirkaŭ brako; *porvivo*: (por→viv-o)→o: aĵo por vivo; *senfino*: (sen→fin-o)→o: senfinaĵo aŭ senfineco; *senlimo*: senlimaĵo aŭ senlimeco.

Ordinare oni uzas anstataŭ ĉi tro "streĉitaj" vortoj la plenajn formojn (senpoveco, senpretendeco); por kelkaj enkondukiĝis novaj radikoj (ĉirkaŭbrako: *braceleto*; senfino: *infinito*).

Rim. Ĉi tie klasiĝas ankaŭ la vortoj *centjaro*, *miljaro*, *deksilabo*, *triangulo*, *tripedo*, *trimasto*, *tridento*. En ili la memstarigon de la finaĵo faras la inversa pluraliga efiko de la numeralo (vd. § 306). Ekzemple, la strukturo de *trimasto* estas:

(tri mastoj)-o.

La plua dissolve de ĉi tiu formulo estas iom komplikita. La memstara o-finaĵo esprimas ion konkretan, ĝia funkcio estas la konkretigo de la antaŭa elementkomplekso. Sed ĉi tiu komplekso jam en si mem estas io konkreta (tri mastoj). La o-finaĵo do abstraktigas ĝin, por povi ĝin konkretigi. La rezulto estos:

(tri→mastoj)→eco←aĵo trimasteaĵo

do: konkreta manifestiĝo de trimasteco: trimasta ŝipo.

Vere, tiu ĉi analizo estas komplikita. Sed ĝuste tiun ĉi komplikecon oni sentas en la vorto, antaŭ ol oni alkutimiĝas: oni sentas, ke la vorto estas iel "streĉita".

Tial oni ankaŭ ne formas tiajn vortkunmetojn *ĝenerale*: la troa komplikeco estas malhelpo por kutima uzado. Oni do ne diras: *dubirdo*, *kvarlibro*, *centhomo* sed *du birdoj*, *kvar libroj*, *cent homoj*. Ĝenerale oni povas diri, ke ju pli komplikita estas la analizo de vortkunmeta tipo, des pli esceptaj estas la kunmetoj faritaj laŭ tiu tipo.

Cetere, la analizon oni povas fari ankaŭ laŭ malpli komplikita vojo: per la *kvalita*

DE. Tiu DE ligas epitethavan substantivon al substantivo, difinante ĝian kvaliton per la epitethava vorto: *homo de granda saĝo*. Laŭ tio:

(tri mastoj)-o estas -o de (tri mastoj)

do: io karakterizita de tri mastoj: trimasta ŝipo.

Rimarku, ke eco de l' unua analizo respondas al la kvalita de.

A-finajaj vortoj

315

1. Unue oni provas analizon laŭ la vortefikaj reguloj (VER. II.). Tia analizo povas sukcesi nur, se la a-finaĵo estas pleonasma.

Ekzemploj: *prespreta*: preta je preso; *amplena*: plena je amo; *plenplena*: plena je pleno; *ŝparema*: ema je ŝparo; *portebla*: ebla je (taŭga) je porto; *kisinda*: inda je kiso. Pri *ebla*, *ema*, *inda* vd. §§ 348, 349, 351.

2. Se la unuagrada analizo ne sukcesis, la a-finaĵo estas mem ĉefelemento kaj povas havi:

a) duoblajn flankelementojn kuntenajn. Ĉi-okaze la substantiviga efiko de la a-finaĵo kroĉas o-finaĵon al la kuntena elementduoblo. Per tio ni havas substantivajn vortkunmetojn, kiujn ni povas plu analizi laŭ unuagrada aŭ duagrada analizo (vd. supre, ĉe o-finaĵaj vortoj). La strukturo do estas (Co-Bo)-a aŭ (Ce←iBi)-o←a aŭ (Ca←iBi)-o←a.

Ekzemploj por (Co-Bo)-a: *urbdoma*: (urbo-domo)-a; *leonkora*: (leono-koro)-a; *korvonigra*: (korvo-nigro)-a; *sunluma*: (suno-lumo)-a; *noktmalluma*: (nokto-mallumo)-a; *ĉielblua*: (ĉielo-bluo)-a; *voĉdona*: (voĉo-dono)-a; *leterskriba*: (letero-skribo)-a; *fruktodona*: (frukto-dono)-a; *ĝermoporta*: (ĝermo-porto)-a; *scivola*: (scio-volo)-a; *ĉiopova*: (ĉio-povo)-a; *memmortiga*: (mem-mortigo)-a; *vivpova*: (vivo-povo)-a.

La plua analizo okazas per *apartena al* (urbdoma), aŭ per *karakterizita de* (scivola, fruktodona ktp.).

Ekzemploj por (Ce←iBi)-o←a: *bonfarta*: (bone←farti)-o←a; *pafmurda*: (pafe←murdi)-o←a; *rapidira*: (rapide←iri)-o←a. Analizo: *karakterizita* (a-finaĵo) *de ago* (o-finaĵo) piki morta, igi manĝa, igi ŝtata;

b) se la analizo laŭ kuntenaj flankelementoj ne sukcesis, ni provas ĝin laŭ disfalaj flankelementoj, kies skemo estas: (aCa/oBo)-a.

Ekzemploj: *bluokula*: (blua okulo)-a; *facilanima*: (facila animo)-a; karakterizita de blua okulo, facila animo.

3. Nesukceso de duagrada analizo atestas pri inversa vortefiko, estigita de maldekstra flankelemento prepozicia aŭ adjektiva. La skemo estas:

(aCa/→B-o)-a aŭ: (Cx/→B-o)-a

kie B-o povas esti egale aB-o aŭ iB-o. Sed tiu analizo ankoraŭ ne estas kompleta: la a-finaĵo, kiel adjektiva ĉefelemento, kroĉas ankoraŭ pluan o-finaĵon al la parenteza komplekso kiel al tuto. La plena skemo do estas:

(aCa/→B-o)-o←a aŭ: (Cx/→B-o)-o←a.

Ekzemploj por la maldekstra elemento Cx: *senforta*: (sen→fort-o)-o←a; *senpretenda*, *senmova*, *senfara*; *eksterordinara*: (ekster→ordinar-o)-o←a;

pardistra. Plua analizo: *karakterizita* (a-finaĵo) de *eco* (o-finaĵo) (sen forto), (sen pretendo), (sen faro); t.e. karakterizita de senfareco, eksterordinareco, pordistreco ktp. Same: *denaska*, *dumviva*, *malgraŭvola*, *perforta*, *porĉiama*, *postmorta*, *propeka*, *sensenca*; *senutila*, *senpera*, *senpripensa*, *antaŭnelonga*, *antaŭlasta*, *enpensa* ktp.

Ekzemploj por la maldekstra flankelemento aCa: *grandkuraĝa*: (granda → kuraĝ-o)-o ← a; *helverda*: (hela → verd-o)-o ← a; *multrilata*: (multaj → rilat-oj)-o ← a; *plenforta*, *diverskonsista*, *plurfoja* ktp. Plua analizo: karakterizita de eco (granda kuraĝo), (plena forto), (hela verdo); t.e. karakterizita de helverdeco, multrilateco, grandkuraĝeco, plurfojeco ktp.

La inversa vortefiko validiĝas ankaŭ ĉe substantiva dekstra flankelemento, per la alkröo de la kroma o-finaĵo. La skemo estas:

(Cx/→oBo)→o←a.

Ekzemple: *ĉirkaŭurba*: (ĉirkaŭ-urb-o)→o←a: karakterizita de ĉirkaŭurbeco. Same: *eksterdoma*, *enpoŝa*, *perletera*, *antaŭdoma*, *apudvoja*, *interakta*, *kuntara*, *senhara*, *subtera*, *supernatura*, *surgenua*, *transmara*.

Verbfinajaj vortoj

316

1. Unue oni provas analizon laŭ la vortefikaj reguloj (VER. III. 1. kaj 2.). Ekzemploj: *pafmurdi* (pafe murdi); *ŝtonbati* (ŝtone bati); *bonodori* (bone odori); *voĉlegi* (voĉe legi); *kunludi* (kune ludi); *ekiri* (eke iri); *ruĝpentri* (pentri ruĝa); *plenŝtopi* (ŝtopi plena); *purigi* (igi pura); *beliĝi* (iĝi bela); *ŝtatigi* (igi ŝtata); *grupiĝi* (iĝi grupaj); *sidigi* (igi sida); *sidigi* (iĝi sida); *kudrigi* (igi kudra).

2. Se la unuagrada analizo ne sukcesis, la i-finaĵo estas ĉefelemento. Ĝi do havas duoblajn flankelementojn, kaj, laŭ VER. III. 1. adverbigas ilin kiel tuton. Aliflanke, la e-finaĵo, kiel adverba elemento, postulas antaŭan substantivon, ĝi do substantivigas la duoblan flankelementon kiel tuton. Se la flankelementoj estas kuntenaj, tiu latentia o-finaĵo kroĉiĝas al la fino de la kunmeto. La skemo do estas:

(Co-Bo)-e←i.

Ekzemploj: *fruktodoni*: (frukto-dono)-e←i: funkcii *per* (= e-finaĵo) fruktodono; *leterskribi*: leterskribe-i; *voĉdoni*: voĉdone-i; (ag) i voĉdone.

3. Nesukceso de la duagrada analizo montras, ke en la vorto ekzistas inversa vortefiko. Tiaokaze la maldekstra elemento estas ĉiam prepozicio. La skemo do estas:

(Cx→Bo)-e←i.

Ekzemploj: *perlabori*: (per→laboro)-e←i: agi, akiri perlaboro; *permiliti*: agi, akiri permilite; *senpovi*: (sen→povo) -e←i: stati senpove.

Multfoje la prepozicio tamen ne estigas vortefikon inversan, sed ebligas analizon laŭ VER. III. 1. aŭ 2. Ekzemple: *interparoli*: intere←paroli; *interrompi*: intere←rompi; *ĉirkaŭiri*: ĉirkaŭe ←iri; *almiliti*: al-a←militi: militi ala (apartena) al si. Vd. § 374.

B. SINTEZO DE VORTOJ

En la sintezo de vortoj validas la principo de Neceso kaj Sufiĉo: enporti ĉiujn elementojn, kiuj necesas, sed ne pli, ol kiom sufiĉas.

317

Ekzemple, volante elvoki la ideon de ĉambro, ni volas elvoki ideon de speciala ejo konkreta. Do la ideo enhavas plej ĝenerale la ideon *o*, malpli ĝenerale la ideojn *aĵo*, *ejo*, kaj malplej ĝenerale la specialan ideon *ĉambro*. La vorto do estus:

ĉambr-ej-aĵ-o = ĉambrejaĵo.

Sed ĉiu *aĵo* estas *o*, ĉiu *ejo* estas *aĵo* kaj ĉiu ĉambro estas *ejo*, do ĉiujn antaŭajn elementojn oni povas eljeti, restas sole

ĉambr.

Al ĝi nun ni alproĉas la pleonasman o-finaĵon por signi la nominativon kaj tiel ni ricevas la vorton

ĉambro.

Volante signi la lokon (ejon) de preĝo, ni havas la elementojn

preĝ-ej-ajo = preĝejaĵo.

Tie ĉi *aĵo* estas superflua, sed *ejo* estas necesa. La vorto do estas:

preĝejo.

Same, primadono estas isto, ulo, ino, o. Do la tuta komplekso estus primadonistulino.

Sed primadono jam havas en si mem la sencon de ĉiuj pluaj elementoj, do ni povas kaj devas ilin eljeti. La formo *primadonino* ekzemple estus malĝusta. Sed en *instruistino* la sufikso *ino* estas necesa, ĉar ĝi aldonas necesan sencoplumon al la komplekso *instruisto*.

La sintezo de duelementaj vortoj estas simpla inverso de la analizo, ni do nun ne okupiĝos detale pri ili. Sed, precipe por instrue ripeti, ni pritraktos la sintezon de la vortoj havantaj finajn flankelementon. Ni donos po unu ekzemplon por ĉiu ebla okazo.

Kuntenaj flankelementoj

a) Ni sintezu la *nomon* de tiu stato, ke *iu bone fartas*. Ni ricevas la skemon:

318

stato (bone farti).

Aŭ, ĉar la ĉefelemento devas esti *stato*,

(bone farti)stato: (bonfarti)stato.

Bonfarti estas vorto analizebla laŭ VER. III. 1. Do en vortkunmeto ĝi

povas esti kuntea flankelemento. Ni do simple al kroĉas la o-finaĵon kaj ni havas la vorton:

bonfarto.

b) Ni sintezu la nomon de tiu *ago*, ke oni *igas ion pura*. Ni starigas la skemon:

(pura igi)-ago: (purigi)ago.

Ago estas pleonasma, do sufiĉas:

(purigi)o.

Al kuntea flankelemento ni povas al kroĉi la o-finaĵon. Rezulto:

purigo.

c) Ni sintezu la adjektivon: *apartena al urbdomo*. Unua ŝtupo:

(urbodomo)-a.

Urbdomo estas analizebla laŭ VER. I. R., do povas esti kuntea flank-elemento. Ni al kroĉas la finaĵon. Rezulto:

urbdoma.

d) Ni sintezu vorton kun la senco: *blua kiel la ĉielo*. Ni povas ĝin esprimi ankaŭ jene: karakterizata de bluo de ĉielo. Do:

(bluo de ĉielo)-a.

Bluo de ĉielo, laŭ VER. I. R. estas *ĉielbluo*, do la supra formo estas:

(ĉielbluo)-a,

aŭ simple:

ĉielblua.

e) Ni sintezu en unu vorton la propozicion: *kiu donas frukton*. Ni povas ĝin koncepti jene: karakterizata de dono de frukto, do

(dono de frukto)-a (frukto-dono)-a

alkroĉante simple la a-finaĵon, ni havas la vorton:

fruktodona.

f) Ni sintezu vorton kun la senco: *kiu ĉion vidas*. Jen la procedo:

karakterizata de vido de ĉio

(vido de ĉio)-a (ĉiovido)-a

ĉiovida.

g) Ni sintezu vorton kun la senco *doni voĉon*. Ni konceptas jene: funkcii per dono de voĉo:

i per (dono de voĉo) i per (voĉdono).

Aŭ, ĉar *per* estas anstataŭigebla per la e-finaĵo:

i (voĉdono)-e (voĉdono)-e-i.

La i-finaĵo, kiel verba ĉefelemento postulas antaŭ si adverbbon, do la e-finaĵo, kiun ĝi markas per sia vortefiko, estas ellasebla. La e-finaĵo, kiel adverba elemento, postulas antaŭan substantivon, do la o-finaĵo antaŭ ĝi estas same ellasebla, ĉar ĝin evidentigas ĝia latentia ĉeesto. La vorto do estas:

voĉdoni.

h) Ni sintezu vorton kun la senco: *meti en poŝon*. Oni povas koncepti jene: *igi tia, kiu estas en poŝo*.

Kiu estas en poŝo estas esprimebla per *enpoŝa* (vd. § 319, b). Do

igi enpoŝa enpoŝa-igi.

Sed *igi* postulas antaŭan adjektivon, do la a-finaĵo antaŭ ĝi estas ellasebla:

enpoŝigi.

Disfalaj flankelementoj

319

a) Ni sintezu en unu vorton la esprimon: *kiu havas grandan kapon*. Ni konceptas jene: karakterizata de granda kapo, do:

(granda kapo)-a.

Granda kapo estas du vortoj rilatantaj inter si laŭ la karaktero de siaj radikoj. Do ili povas esti disfalaj flankelementoj de la a-finaĵo propra-funkcia. La rezulto do estas:

grandkapa.

b) Ni sintezu en unu vorton la esprimon: *kiu estas ĉirkaŭ domo*. Ni konceptas jene: karakterizata de eco (esti) ĉirkaŭ domo; karakterizata de eco (ĉirkaŭ domo): – do:

[(ĉirkaŭ domo)-eco]-a.

Eco povas kunkroĉi disfalajn flankelementojn (prepozicion kun substantivo), do:

ĉirkaŭdomeco-a ĉirkaŭdomeca.

Sed *ec* estas superflua antaŭ *a* havanta la saman sencon. Do la fina rezulto estas:

ĉirkaŭdoma.

c) Ni sintezu la esprimon: *kiu havas multajn pretendojn*. Ni konceptas: karakterizata de multaj pretendoj:

(multaj pretendoj)-a.

Mult kiel numeralo postulas postan substantivon kaj pluralon en disfala flankelemento (vortefiko inversa). Do ĝi signas same la pluralecon, kiel la substantivecon de la verba radiko *pretend*. La elementoj *oj* do estas ellaseblaj. Restas:

(mult pretend)-a *multpretenda*.

d) Ni sintezu la esprimon: *kiu ne havas utilon*. Ni konceptas jene: kiu estas sen utilo, do:

karakterizata de eco esti sen utilo

karakterizata de eco (sen utilo)

[(sen utilo)-eco]-a.

Util estas adjektiva radiko, sed la inversa vortefiko de la prepozicio *sen* neprigas post si substantivon, do markas la o-finaĵon, kiu sekve estas ellasebla. Restas:

[(sen util)-eco]a *senutileca*.

Sed *eca* estas preskaŭ ĉiam ellasebla antaŭ *a*. Do, la rezulto:

senutila.

e) Ni sintezu la esprimon: *esti sen povo*. Ni konceptas: esti karakterizata de eco (sen povo), do, laŭ la analogio de la sintezo de *senutila*:

esti senpova.

Ĉar *esti* antaŭ adjektivoj estas anstataŭigebla per *i*:
(senpova)-i.

I postulas antaŭan predikatan adjektivon, do ĝi markas la a-finaĵon, kiu sekve estas ellasebla. Rezulto:

senpovi.

Oni povas fari ankaŭ la sinoniman formulon: *stati senpove* kaj plu sintezi: *senpove* (stat)i: *senpovi*.

Streĉado de formoj

320

Tiel ni nomas vortmallongigojn estigitajn per tio, ke oni ellasas elementojn el la sintezo kaj konfidas ilian anstataŭadon al la latentaj finaĵoj estigitaj de vortefikoj rekta kaj inversa.

a) Ni streĉu la vorton: *senpretendeco*. Ĝia skemo estas
(sen pretendo)-eco.

Ĉar (sen pretendo) estas evidente *eco*, *eco* sence estas ellasebla:
(sen pretendo)-o senpretendoo

El la du apudaj o-finaĵoj unu ni signas, la alian ni lasas latente estiĝi per la inversa vortefiko de *sen*. Do la streĉita formo estas
senpretendo.

b) Ni streĉu la vorton *senfineco*. Laŭ la analogio de *senpretendo*, la procedo jene okazas:

senfineco
(sen fino)eco.
(sen fino)o
senfinoo
senfino.

c) Ni streĉu la vorton *porvivaĵoj* (aĵoj por vivi). Laŭ la supraj analogioj:
porvivaĵoj
(por vivi)aĵoj
(por-vivi)oĵoj
porvivioj

kaj fine, ĉar *por* neprigas post si la infinitivan (por vivi) aŭ la substantivan (por vivo) formon per sia inversa vortefiko, la rezulto estos:
porvivoj.

d) Kiel streĉado de formoj estas rigardebla ankaŭ ellaso de sufiksoidoj antaŭ *igi* kaj *iĝi*:

enveturiĝi = enveturiliĝi
enloĝiĝi = enloĝejiĝi.

3. LA AFIKSOIDOJ

321

Kiel ni jam diris (§ 276), la radikoj nomataj afiksoidoj havas kelkajn specialaĵojn, pro kiuj (kaj pro ilia aparta graveco en la lingvo-formado) estas necese okupiĝi pri ili speciale. Tion ni faros en la sekvantaj ĉapitroj, pritraktante unue la *sufiksoidojn* kaj poste la *prefiksoidojn*.

A. SUFIKSOIDOJ

Difino

322

Sufiksoidoj ni nomas tiun parton de la sufiksoj, kiuj propre ne estas sufiksoj, ĉar ili funkcias tute same kiel la radikoj. Tio estas:

1) ili povas esti uzataj memstare, kun finaĵo, same kiel la radikoj (eco, aĵo, ino, ilo, igi, iĝi, ema, inda ktp.);

2) en siaj kunmetoj ili obeas la vortefikajn regulojn.

Inter radiko kaj sufiksoido do ne ekzistas esenca diferenco. La sufiksoid-kunmetoj estas simplaj vortkunmetoj.

Rim. La samecon de radiko kaj sufiksoido plej klare montras la ekzemplo de la elemento *edz*. En la komencaj tempoj de la lingvo oni ĝin rigardis sufiksoido, dum hodiaŭ ĝi estas klasita inter la radikoj, ĉar ĝi estas multe pli ofte uzata radike ol sufiksoido. La sufiksoida uzo servas por signi personon, kiu estas la edz(in)o de profesiul(in)o, mem ne havante ties profesion (*reĝinedzo*, *kuracistedzino*).

Oni povas diri, ke la sufiksoidoj estas radikoj, kies formo estas tiel elektita, ke ili, ne estigante konsonantkambolojn, estu pli oportunaj por vortkunmeto ol la plurfoje pezaj aŭ tro longaj radikoj veraj. Plejofte la sufiksoidoj estas duoblaĵoj (ilo-instrumento, ema-inklina, inda-meritanta, ejo-loko ktp.). Tio ebligas doni al kelkaj iliaj kunmetoj specialan, pli strikte limitan senco (vidu poste).

Karl Minor en sia *Esperanto-Deutsches Handwörterbuch* akcentas tri gravajn diferencojn inter la radikoj kaj sufiksoj. Tiuj estas (en nia traduko):

a) La memstara vorto (radiko) en E-o respondas al nacilingva memstara vorto, dum la signifo kaj efiko de afikso ne estas interpreteblaj per nacilingva vorto; oni devas ĝin klarigi per ekzemploj.

b) Ĉe kunmeto de radikoj, la dua radiko povas ligiĝi al la unua radiko *nuda* (dormĉambro) kaj ankaŭ al la unua radiko *finafa* (dormoĉambro). Male, sufikso povas ligiĝi nur al la radiko *nuda*.

c) Ĉe duradikaj kunmetoj staras ĉiam la ĉefa vorto en la fino. Male, ĉe radiko-sufiksaj kunmetoj staras ĉiam la sufikso en la fino, eĉ se ĝi ne estas la ĉefa vorto.

El tiuj tri reguloj, la regulo a) ne validas pri la sufiksoidoj. Rilate al *efiko* ne ekzistas diferenco inter radiko kaj sufiksoido (ambaŭ obeas al VER.). Rilate al *signifo*, multaj vorto-sufiksoido-kunmetoj estas tradukeblaj nacilingve per vorto-vorto-kunmeto (almenaŭ en lingvo same sinteza kiel E-o). Jen ekzemple: *aminda*: liebenswürdig; *haltejo*: Halte-

stelle; *grupestro*: Gruppenleiter; *reĝido*: Königskind; *fermilo*: Schliessapparat; *dentisto*: Zahnkünstler; *inkujo*: Tintenfass ktp. Similajn ekzemplojn kiel el la germana, oni povus citi el la sintezema hungara lingvo. Estas ja vere, ke tio ne ĉiam estas ebla, sed ties kaŭzo estas nur, ke E-o formas ĉiujn vortojn regule kaj unuece, dum la naciaj lingvoj estas kapricaj. Kontraŭe, la kunmetoj de veraj sufiksoj devas esti, vere, interpretataj per nacilingvaj sufiksoj. Tiu regulo do evidentigas nur la neceson de distingo inter sufiksoidoj kaj sufiksoj veraj.

Diferenco *b)* tute ne estas esenca. Ankaŭ la dua radiko ligiĝas ĉiam al radiko nuda, kiam tio estas ebla sen konsonantkarambolo aŭ endanĝerigo de klareco (vd. § 309). Kompreneble, ĉe la sufiksoj neniu el la tri tie menciitaj malhelpoj ekzistas ĝenerale, ĉar ili havas oportunan formon kaj oni sufiĉe ofte uzas ilin en kunmetoj por ĉiam rekoni ilin sen peno. Sed se, esceptokaze, tamen necesas konservi la finaĵon, oni tion ja faras (*posteulo*, *unuaeo*).

Diferenco *c)*, kvankam tre lerte formulita, estas tre malmultedira, ĉar ĝi ne diras, kiuj sufiksoj staras en la fino, eĉ se ili ne estas ĉefelementoj. Ĝi do ree evidentigas la neceson de distingo inter sufiksoidoj kaj sufiksoj veraj. Sufiksoidoj staras ĉiam vortfine, se ili estas ĉefelementoj. Se ili ne staras vortfine, ili estas flankelementoj (*estro-elekto*, *ilo-riparo*, *emo-ŝanĝo*, *ejo-purigo*, *ano-elekto*).

Cetere, oni povas doni la konsilon, ke apud sufiksoido oni konservu la finaĵon, se la sufiksoido estas flankelemento. Tio estas oportuna, ĉar ĝi staras tiaokaze sur nekutima loko, do oni devas ĝin fari pli rekonebla, same kiel oni faras ĉe *dio-simila* kaj *luo-domo* (vd. § 309).

Specialaĵoj

323

Oni povus fari inter radikoj kaj sufiksoidoj tiun distingon, ke la sufiksoid-kunmetoj ofte ricevas sencon pli strikte limitan, ol ilia vera signifo. Ekzemple: *pafilo* ne estas ĉia pafinstrumento, sed nur *unu certa* el ili; *homaro* ne estas simple aro da homoj, sed ĉiuj homoj en la mondo. Tamen ĉiujn ĉi sencojn la elementkomplekso ja entenas, ili estas nur striktigitaj aŭ ĝeneraligitaj. Cetere, la evoluo de la lingvo iom post iom anstataŭigas tiajn formojn per radikoj. Tiel aperis ekzemple *fusilo* (pafilo), *ŝpato* kaj *pioĉo* (fosilo) ktp. Kompreneble, estas nenecese anstataŭigi ĉiujn tiajn formojn, (ekz-e *flugilo*, *homaro*, *ŝlosilo*), eĉ se por ili ekzistas apartaj radikoj en la naciaj lingvoj. Multaj tiaj formoj konservos ĉiam sian pli striktan aŭ pli ĝeneralan sencan, kaj por alia senco oni uzos aliajn formojn (*flugmaŝino*; *aro da homoj*, *homamaso*; *ŝlosaparato*).

Rim. I. Kelkfoje la sufiksoido-kunmeto povas perdi sian propran signifon kaj signifi ion forme similan al la ideo, kiun ĝi esprimas. Tiel oni povas paroli pri *flugiloj* (alroj) de domo, de altaro, kvankam nek domo flugas, nek altaro. Tamen, oni ne diras *magneta kudrilo*, ĉar oni ankoraŭ tro sentas en la vorto *kudrilo* la sencan, ke ĝi estas ilo de kudrado, kaj oni uzas *montrilo* aŭ *nadlo*.

Cetere ankaŭ ĉe radik-kunmetoj povas okazi, ke iliaj elementoj tute perdas sian originan signifon, kaj oni konsideras la kunmetaĵon kvazaŭ radikvorton. Tiel oni povas klarigi la esprimon: *ora huffero*. Same, en *ĉevalpovo*, la senco de *povo* estas alia ol en *hom-povo*.

Rim. II. Ĉiu sufikso servas por esprimi difinitan ideon, sed inverse ne estas vere, ke la koncerna ideo estas ĉiam esprimita per tiu sufikso: okazas ofte, ke ĝi estas esprimita en aparta radikoj; ekz-e *ejo* en teatro, fabriko, uzino; *isto* en barbiro, ekonomo, advokato; *ilo* en agraro, akumulatoro, cirkelo, peniko ktp. Aparte pri *ilo*, oni devas diri, ke la naciaj lingvoj, imititaj de Esperanto, uzas du paralelajn metodojn: ili derivas aŭ la il-vorton el la verbo, aŭ la verbon el la il-vorto. La unua procedo (primitiva verbo, sufiksa il-substantivo) estas pli logika, kiam la agon oni povas fari per ne severe specialigitaj instrumentoj; la dua (primitiva il-substantivo, derivita agverbo) estas pli logika, kiam la instrumento estas tiel speciala, ke nur per ĝi oni povas fari la agon: ekz-e *violoni* oni povas nur per *violono* sed *muziki* oni povas per multspecaj *muzikiloj*. Tiu distingo tamen ne estas ĉiam aplikita en Esperanto: ekz-e *segi* oni povas nur per *segilo* (kiu tamen respondas al derivita vorto), *rigli* nur per *riglilo* ktp.

Ĉar la sufiksoidoj estas egalvaloraj al la radikoj, ankaŭ en iliaj kunmetoj povas validiĝi diversaj interelementaj grupiĝoj. Ekzemple, en la vorto *lernebleco* la grupiĝo estas

(iCo-aBo)-(eco) : (lern-eblo)-eco

do lerneblo kiel eco; tiu eco, ke io estas lernebla; male en la vorto *reveneblaĵo* la grupiĝo estas

(iBo)-(aAa-aĵo) : (reveno)-(eblaĵo)

do eblaĵo de reveno.

Ĉi tiun duan grupiĝon ebligas la netransitiveco de *reveni*. Ĉar *ebla*, kiel adjektiva sufiksoido, atribuas pasivan senco (laŭ sia speciala signifo) al sia verba flankelemento, al netransitiva verbo ĝi ne povas rilati laŭ VER. II. (ebla je). Ĝi do funkcias, kune kun -aĵo, kiel duobla ĉefelemanto, laŭ VER. I. (eblaĵo de reveno). Tie ĉi do ni havas *inversan* vortefikon estigitan per la netransitiveco de *reveni* (kp. § 304, Rim. I.). Ĉar tia funkcio de *ebla* estas nekutima, oni metu dividstrekon kaj helpu la komprenon ankaŭ per la prononco (paŭzo post *reven*: *reven-eblaĵo*). Tamen, se tiu vorto estus ofte uzata, tia klariga prononco certe iĝus superflua.

Rim. III. Komprenoble, post transitiva verbradiko ne estas ebla tia uzo, ĉar *ebla* estus komprenata laŭ sia kutima funkcio. *Venkebleco* do ne estas uzebla anstataŭ *ebleco de venko*, ĉar ĝi signifas: (venkeblo)-(eco): *eco esti venkebla*. Vd. § 354.

Divido

La sufiksoidojn ni pritraktos laŭ jena ordo:

324

1. Kategorio-sufiksoidoj: **ado, aĵo, eco, ulo**. Post **ado** ni klarigos ankaŭ la strukturon de la *participaj finaĵoj*.

2. Substantivaj sufiksoidoj: **ano, aro, ejo, ero, estro, ido, ilo, ino, ingo, ismo, isto, ujo** kaj (neoficialaj) **io, iko, ito**.

3. Adjektivaj sufiksoidoj: **ebla, ema, enda, inda** kaj (neoficialaj) **eska, iva, oida, oza**.

4. Verbaj sufiksoidoj: **igi, iĝi** kaj (neoficiala) **izi**.

Fine ni parolos pri la kvazaŭsufiksoidoj: radikoj tiel ofte uzataj vortfine, ke oni povas ilin rigardi sufiksoidoj.

I. KATEGORIO-SUFIKSOIDOJ

325

Tiel ni nomas la sufiksoidojn **ado, aĵo, eco, ulo**, kiuj estas anstataŭaĵoj de la o-finaĵo, signante *agon* (ado), *konkreton* (aĵo), *abstrakton* aŭ *kvaliton* (eco), *personon* (ulo).

Efektive, ili signifas la kvar plej ĝeneralajn kategoriojn, en kiuj la penso klasas la pensobjektojn: la *konkretajn* (aĵoj kaj uloj) kaj la *abstraktajn* (agoj kaj kvalitoj).

El ĉi tiuj kvar kategorio-sufiksoidoj, **ado** estas rigardebla kiel substantivigo de la i-finaĵo (i-o), **eco** kiel substantivigo de la a-finaĵo (a-o). **Ado** do estas rigardebla ankaŭ verba, **eco** ankaŭ adjektiva sufikso. Tamen, ĉar ilia ĉefa funkcio estas substantivigo, ni pritraktas ilin kape de la substantivaj sufiksoj. Kaj ĉar ilia funkcio estas analoga, ni pritraktos ilin en komuna ĉapitro, je kies fino ni resumos mallonge ilian analogecon.

326

ADO

Ado estas substantivigita verba finaĵo (i-o). Ĝia signifo do estas *ago*.

1. Post *substantivaj* radikoj ĝiaj kunmetoj estas analizataj per i-o. La strukturo do estas:

oRe-i-o

ĉar *i* kiel verba elemento postulas antaŭan adverbon.

Ekzemple: *martelado*: (martele)-i-o: ago per martelo; *kronado*: (krone)-i-o: ago per krono; *brosado*; *kanonado*; *kulturado*; *orado*; *pulsado*; *ondado*; *regulado*; *reĝado*; *tajlorado* ktp. Ili estas substantivigoj de la verboj: marteli, kroni, brosi, kanoni, kulturi, ori, pulsi, ondi, reguli, reĝi, tajlori, do la *nomoj* de la respektivaj agoj.

Rim. I. *-ado* estas ankaŭ uzata literature, por nomi longan poemon, kiu rakontas la agojn de heroo: *Odiseado*, *Eneado*, *Mesiado* aŭ de popolo: *Iliado*, *Luziado*. (G.W.)

2. Post *adjektivaj* radikoj oni same analizas per i-o. La strukturo do estas:

Ekzemple: *verdado*: (verda)-i-o: stato esti verda; *utilado*: (utile)-i-o: ago funkcii utile; *rapidado*; *spritado*; *malfruado*; *falsado* ktp. Ili estas substantivigoj de la verboj verdi, utili, rapidi, spriti, malfrui, falsi, do la *nomoj* de la respektivaj agoj aŭ statoj.

3. Post *verbaj* radikoj la pli simpla analizo okazas laŭ VER. I. E. Do *-ado* iĝas substantiva epiteto de sia flankelemento. Ekzemple: *konstruado* estas *konstruo ado*: konstruo ago: konstruo, kiu estas ago.

Estas evidente, ke apud verbaj radikoj **ado** estas pleonasma, ĉar la

simplaj verbo-substantivoj jam mem signifas agon. Nu, la lingvo uzas tiajn pleonasmajn formojn por tri celoj:

a) Por signi *nepre* la agon, do ekskludi la sencon de rezulto, konkreta manifestiĝo, aŭ abstraktaĵo, kiun ofte havas la verbosubstantivoj. Ekzemple: *skribado* (ne skribaĵo), *konstruado* (ne konstruaĵo), *kantado* (ne kanto), *pensado* (ne penso), *amado* (ne amo), *timado* (ne timo), *dubado* (ne dubo), *revado* (ne revo), *dormado* (ne dormo).

b) Por signi, per la akcento de la aga elemento, la longan daŭron de la ago. Ekzemple: *irado*, *naĝado*, *flugado*, *remado*, *manĝado*. Tiu senco estiĝas ĉe agoj *kontinuuaj*.

c) Por signi, per la akcepto de la aga elemento, la plurfojan ripeton de l' ago. Ekzemple: *pafado*, *batado*, *falado*. Tiu senco estiĝas ĉe agoj *momentaj*.

Rim. II. Senco b) kaj c) estiĝas kelkfoje, per analogio, ankaŭ ĉe kunmetoj kun substantivaj radikoj; ekzemple: *martelado*, *penikado*, *brosado*. Tie do, por signi solan agon, oni devas uzi aliajn kunmetojn: *martelbato*, *peniktuŝo*, *brostiro*.

4. Post *prepozicioj*, *-ado* esprimas la nomon de la ago aŭ stato esprimita per la i-finaĵa formo. Do *anstataŭado*, *superado*, *preterado* estas agoj aŭ statoj *anstataŭi*, *superi*, *preteri*. Same ĉe interjekcioj: *vivuado*, *huraado*, *bisado*.

P l u f o r m a d o de la ado-kunmetoj povas okazi

1. per la *rilata a-finaĵo*. Ekzemple: *kronada procesio*: procesio de kronado; *martelada bruoj*: bruoj de martelado.

2. per la *i-finaĵo*. Ĝi estas ĉiam pleonasma, ĉar la verbaj finaĵoj jam mem signifas agon. Apud verbaj radikoj ni havas eĉ duoblan pleonasmemon. Tiu pleonasmeco, per la akcentado de l' aga elemento, signas:

a) *longan daŭron*: *iradi*, *manĝadi*, *kuŝadi*;

b) *ripeton de ago*: *pafadi*, *marteladi*, *batadi*, *faladi*. Vd. § 107.

3. En kunmetoj, kiel parto de flankelemento ĝi signas agon. Ekzemple: *najladmaŝino* (ne najlo-maŝino: maŝino de najloj, sed maŝino de najlado); *ankradejo* (ne ejo de ankro, sed ejo de ankrado).

Rim. III. Oni povas ĝin uzi ankaŭ por signi agan elementon antaŭ *igi* kaj *iĝi*. Ekzemple: *marteladigi*: igi martelada: igi karakterizata de martelado. Oni plejofte ellasas ĝin tiaokaze, kontentigante per la elizia formo *marteligi*, *kronigi*: igi martela, krona: igi karakterizata de martelo, de krono. Tiuj formoj, kvankam aŭdacaj, ne lasas dubon pri sia senco (vd. § 358, 3. b).

PARTICIPAJ FINAĴOJ: ANT, INT, ONT, AT, IT, OT

La particip-finaĵoj estas propre finajkompleksoj. Ili esprimas verbecon (i) kaj adjektivecon (a). Sed ĉar verba radiko estas adjektivigebla nur tra substantivigo, ili enhavas meze ankaŭ la substantivan finaĵon latentan. Ilia strukturo do estas I-O-A.

Kiel ni vidis, la strukturo de ad estas I-O. La participaj finaĵoj do havas strukturon komunan kun *ada*. Sed de tiu ĉi ilin distingas:

ke ili signas ankaŭ la aktivecon aŭ pasivecon (nt aŭ t);

ke ili signas ankaŭ la gradon de plenumiĝo de la ago (a, i, o).

Rim. I. En la lingvokonstruo ekzistas eblaĵo ankaŭ por signi per la participo la kondicionalan modon de la ago (*havunta*: kiu havus; *havuta*: kion oni havus). Sed tiuj formoj, kvankam proponitaj, apenaŭ estas uzataj ĝis nun. Cetere, ili estas nur malofte aplikeblaj (vd. § 257, I. 4).

Laŭ lingva konvencio*, la senpera substantivigo de la participoj signas ne *kvaliton*, kiel tion postulus ilia adjektiveco, sed *personon*, agantan aktive aŭ tolerantan pasive la agon (*amanto*: kiu amas; *amato*: kiun oni amas).

Tiu speciala signifo de la o-finaĵo havas certajn konsekvencojn ĉe la pluformado.

1) se oni pluformas particip-substantivon per la a-finaĵo, el la vorto perdiĝas la personsignifa elemento kaj oni ricevas la simplan particip-adjektivan signifon. Do oni ne povas diri *prezidanta seĝo* anstataŭ *seĝo de prezidanto*, ĉar tio signifus, ke la seĝo mem prezidas. Por signi la elfalantan personsignifan elementon, oni devus uzi la sufiksoidon **ul**: *prezidantula seĝo*. Tamen, anstataŭ tia peza formo, oni prefere helpas sin per verbo-adjektivo, havanta preskaŭ la saman signifon: *prezida seĝo* (seĝo de prezido), aŭ per **ul**: *militkaptula tendaro*.

2) se particip-adjektivon difinitan per adverbo oni pluformas per la o-finaĵo, la adverbo devas transformiĝi en adjektivon. Sed per tio la senco ofte ŝanĝiĝas, ĉar dum la adverbo difinis la *agon* esprimitan per la participo, la adjektivo difinas la *personon*, kiu la agon plenumas aŭ suferas. Oni do ĉiam devas esplori la novan formon el tiu ĉi vidpunkto: *senvive kuŝanta* estas transformebla al *senviva kuŝanto*, sed *kruela batita* havas tute malsaman senco ol *kruela batito*; *germane parolanta* povas esti ne-germano, kiu germane parolas, dum *germana parolanto* estas germano, kiu eble parolas france aŭ Esperante. Vd. § 128, Rim. II.

En vortkunmetoj la participaj ĉefelementoj kondukas diversmaniere: a) particip-ĉefelementa vorto povas esti pluformita el verb-ĉefelementa vorto: *pafmurdita*, *martelbatita*, *ruĝpentrita*, *purigita*, *ŝanĝiĝinta* estas simple la participaj formoj de *pafmurdi*, *martelbati*, *ruĝpentri*, *purigi*, *ŝanĝiĝi*.

b) ĝi povas esti pluformita el kunmeto, kies ĉefelemento estas verbo-substantivo kaj kies flankelemento signas la *objekton* de la ago de la

* Tiun konvencion Zamenhof klarigis jene: "La sufikso de participo enhavas en si mem la ideon pri io *konkreta* (iu aŭ io, kiu... -as), sekve verbo, substantivigita per participa sufikso, povas esprimi nur konkretajn (ulon aŭ aĵon). Kaj ĉar en la grandega plimulto da okazoj la participa sufikso, laŭ sia senco mem, esprimas ulon, tial laŭ la principo de sufiĉo ni ne bezonas konstante aldonadi al ĝi la sufikson 'ul', kaj nur en tiuj maloftaj okazoj, kiam per la dirita sufikso ni volas esprimi ne ulon, sed aĵon, ni aldonas la sufikson 'aj' ". (L.R., 6a eld., n-ro 114).

ĉefelementa verbo: *leterskribanta, almozpetanta, voĉdonanta* devenas el *leterskribo, almozpeto, voĉdono*.

c) ĝi povas esti pluformita el kunmetoj sammanieraj kiel sub b), sed kun flankelemento signanta la *subjekton* de la ago de la ĉefelementa verbo: *infanskribita, sunbrunigita, hajlobatita* devenas el *infanskribo, sunbrunigo, hajlobato*. Analizo per DE: *letero skribita de infano, vizaĝo brunigita de suno, kampo batita de hajlo*.

Rim. II. Ĉar la participo jam enhavas la verban elementon, ĝin ne estas necese signi, se la ĉefelementa radiko ne estas radike verba. Do el *hajlomartelado* devenas simple *hajlomartelita*.

Kompreneble, oni povas substantivigi la suprajn formojn nur tiam, kiam per tio oni signas personon: *pafmurdito, leterskribanto, sunbrunigito*.

Rim. III. Participa substantivo povas esti rigardata ankaŭ kiel simpla substantiva ĉefelemento kaj la kunmeton oni povas analizi simple laŭ VER. I. Ekz-e: *leterskribanto*: skribanto de letero; *infanskribanto*: infano skribanto; *membro-abonanto*: membro abonanto (vd. § 291).

Pli detalan pritrakton de la participfinajoj vd. § 96, 102 kaj 118.

AĴO

Aĵo estas: *io konkreta, sensebla*.

328

Kun ĉi tiu senco ĝi funkcias en siaj kunmetoj. Kiel substantivradika sufikso, ĝi postulas antaŭ si ĉiam substantivan flankelementon.

Plej ofte ĝi ligiĝas al adjektivaj kaj verbaj radikoj, sed povas ligiĝi ankaŭ al radikoj substantivaj.

1. *Adjektivaj radikoj.* La kunmeton oni analizas ĉiam laŭ VER. I. E. Do aĵo substantivigas la adjektivradikan flankelementon kaj iĝas ties substantiva epiteto. Ekzemple: *bonaĵo*: bono aĵo, bono, kiu estas aĵo, aŭ — ĉar aĵo estas io konkreta, sensebla —: bono, kiu estas sensebla: *sensebla manifestiĝo de abstrakto bono*.

Ekzemploj: *belajaĵo, utilajaĵo, spritajaĵo, malglatajaĵo, dolĉajaĵo, molaĵo, kurbajaĵo, necesajaĵo, novaĵo, ĝentilaĵo, manĝeblaĵo, vidindaĵo, kalvaĵo, nudaĵo*.

Estus erare analizi la suprajn vortojn per la adjektivigo de la flankelemento. *Belajaĵo* ne estas *bela aĵo*, sed *belo aĵo*, ĉar substantiva ĉefelemento postulas antaŭan substantivon. Tion montru kelkaj ekzemploj: *liajn bonaĵojn ni rekompencis per bonaj aĵoj; ŝiaj belajaĵoj superbrilis la belajn aĵojn ĉirkaŭ ŝi; dolĉa viando estas dolĉa aĵo, sed ne dolĉajaĵo; la malglatajn aĵojn oni pene rulis tra la malglatajaĵoj de la vojo; la aŭtomato estas sprita aĵo, sed ne spritajaĵo; ne estas novaĵo, ke nova aĵo plaĉas*.

La diferenco inter la du formoj estas evidenta. La adjektiva formo signifas, ke ia aĵo havas ian *okazan* kvaliton, dum la *aĵo*-kunmeto signifas la senseblan manifestiĝon de la respektiva kvalito.

2. *Verbaj radikoj.* La kunmeton oni analizas same laŭ VER. I. E. Ekzemple: *skribaĵo*: skribo aĵo, skribo, kiu estas aĵo, aŭ (ĉar *aĵo* estas

io konkreta): skribo, kiu estas konkreta, do: *konkreta manifestiĝo de la ago skribo*. Ni vidis (vd. § 286), ke tiun konkretan manifestiĝon povas esprimi ankaŭ la simpla verbosubstantivo. *Aĵo* kiel epiteto do nur pliprecizigas, fiksas, neprigas tiun ĉi sencon. Ĝi diras, ke el la eblaj du sencoj de *skribo* (ago kaj konkreta manifestiĝo, rezulto) temas nepre pri la lasta.

Kio estas tiu konkreta manifestiĝo de ago, tio estas ĉiam evidenta el la senco de la verbo mem.

a) ĉe verboj, kiuj esprimas *produktadon, kreon, faron*, la konkreta manifestiĝo de la ago estas evidente la *rezulto* de la ago. Ekzemple: *bindaĵo, ĉarpentaĵo, dekoltaĵo, draŝaĵo, segaĵo, fandaĵo, fosaĵo, bravuraĵo, konstruaĵo, pentraĵo, skribaĵo, desegnaĵo* ktp. estas, kion oni kredis per bindado, ĉarpentado, dekoltado, draŝado, segado, fando, fosado ktp.

Rim. I. Ĉar la aĵo-kunmeto signas la rezulton de la ago, oni ne povas per ĝi signi tion, kion la ago koncernas. Do ekz-e *pomo*, pri kiu oni pentras "mutan naturon", ne estas *pentraĵo*, nek tio, kion oni *bindas* (libro), *skribas* (penso), *imitas* aŭ *kopias* (originalo) estas *bindaĵo*, *skribaĵo*, *imitaĵo*, *kopiaĵo*; sed *bindaĵo* estas la ekstera libro-tabulo; *skribaĵo* estas, ekz-e, letero, ktp.; do tio, kion oni produktas. *Dekoltaĵo* estas ne la vesto, sed la manko en la vesto, *segaĵo* estas ne la segita ligno, sed la polvo, kiun oni produktas dum segado ktp. La suprajn aferojn oni povas esprimi per la pasiva participo: *pentritaĵo, binditaĵo, skribitaĵo, imititaĵo, kopiitaĵo, segitaĵo* ktp. Ĉe personoj sen aĵo: *pentrito* (aŭ *pripentrito*), *imitito* ktp.

Ni jam vidis (§ 293), ke ankaŭ la simpla verbo-substantivo povas esprimi la ag-rezulton, helpate de la kunteksto (*altaj konstruoj*). Kelkaj verbsubstantivoj estas konvencie ĉiam tiel uzataj: *kopio*, la agon oni signas per *kopiado* (do la lingvuzo ŝanĝis la karakteron de *kopi* en substantivan); male *imito* signas agon, do ĝi restis verba radiko (imitaĵo).

b) ĉe verboj, kiuj esprimas *staton, procezon*, la konkreta manifestiĝo de la ago estas evidente mem la *subjekto*, kiu statas, kiu procezas. Ekzemple: *apartenajo, bolaĵo, brulaĵo, degelaĵo, estaĵo, ekzistaĵo, eksplodaĵo, falaĵo, kreskaĵo, konvenaĵo, mortaĵo, okazaĵo, putraĵo, rampaĵo, ŝvelaĵo, valoraĵo, vegetaĵo* ktp. estas, kio apartenas, bolas, brulas (aŭ bulis), degelas, estas, ekzistas, eksplodas, falas, kreskas, konvenas, mortis, okazas, putras, rampas, ŝvelas, valoras, vegetas. Ĉe tiuj verboj do la aĵo-kunmeto signifas tiun konkretajn, kies kvazaŭa esenco estas la respektiva ago, tiel ke la konkretajn mem oni povas rigardi kvazaŭ konkreta manifestiĝo de la respektiva ago.

c) ĉe verboj, kiuj signifas *aplikon* de objekto por ia celo, la konkreta manifestiĝo estas mem la *uzata objekto*. Sed tiuj verboj estas *altern-subjektaj*: ili esprimas jen la aplikon de objekto, jen la agon de la respektiva objekto mem. Ekzemple: *mi kovras ion per tapiŝo; la tapiŝo kovras ion*. Lastsence, la aĵo-kunmeto signifas la subjekton, kiu la respektivan agon plenumas laŭ sia destiniteco, al kiu la respektiva ago donas kvazaŭ la karakteron kaj esencon, tiel ke ĝin oni povas rigardi kvazaŭ konkreta manifestiĝo de la respektiva ago. Do ambaŭvoje oni

venas al la sama rezulto: *baraĵo* estas konkreta manifestiĝo de *barado*, do objekto, *kiu baras*, kaj *per kiu oni baras*.

Ekzemploj: *amuzajo*, *armaĵo*, *baraĵo*, *citaĵo*, *distraĵo*, *finajo*, *gluaĵo*, *garnaĵo*, *ilustraĵo*, *komencaĵo*, *karakterizaĵo*, *garantiaĵo*, *kotizaĵo*, *legitimaĵo*, *nutraĵo*, *okupaĵo*, *ornamaĵo*, *provaĵo*, *pruvaĵo*, *ŝtopaĵo*, *ŝmiraĵo*, *vestaĵo*, *vindaĵo* ktp. Ilia senco estas: *kio*, aŭ *per kiu* oni amuzas, armas, baras, citas, distras, finas, gluas, garnas, ilustras, komencas, karakterizas, garantias, kompensas, kotizas, legitimas, nutras, okupas, ornamas, provas, pravas, ŝtopas, ŝmiras, vestas, vindas ktp.

d) Ĉe transitivaj verboj signantaj *rilaton* aŭ *rilatŝanĝon*, la konkreta manifestiĝo de la ago estas la objekto, pri kiu la ago temas. Estas evidente, ke *konkreta havo* estas tio, *kion oni havas*. Ekzemploj: *akiraĵo*, *aneksaĵo*, *bezonaĵo*, *gajnaĵo*, *havaĵo*, *heredaĵo*, *perdaĵo*, *posedaĵo*, *trovaĵo*. Ilia senco estas: *kion oni* akiris, aneksis, bezonas, gajnis, havas, heredis, perdis, posedas, trovis.

e) Ĉe verboj, kiuj signas *aplikon de ago al objekto* (agaplikaj verboj), la ago ne havas evidentan konkretan manifestiĝon. Tie do *aĵo* ne povas funkcii kiel simpla epiteto (analizo E.), ĉar tiel ĝi signus ion, kio ne ekzistas. Ĉe tiuj verboj la aĵo-kunmeto postulas analizon R. *Mangaĵo* estas *aĵo de mango*. La senco de aĵo estas *objekto*, do *mangaĵo* estas *objekto de mango*. Tiaj aĵokunmetoj estas: *abomenaĵo*, *frandaĵo*, *glutaĵo*, *komercaĵo*, *legaĵo*, *laboraĵo*, *mangaĵo*, *miraĵo*, *studaĵo*, *trinkaĵo*, *vidaĵo* ktp.: *objektoj de* abomeno, frando, gluto, komerco, lego, laboro, mango, miro, studo, trinko, vido ktp.

f) Ĉe verboj esprimantaj *spiritan funkcion*, la rezulto de la spirita ago estas mem la ago. Ĉe ili do *aĵo* apenaŭ estas uzata. Anstataŭ *pensaĵo*, *sentaĵo*, *konaĵo*, *sciaĵo*, *revaĵo* ktp. oni diras plejofte: *penso*, *sento*, *kono*, *scio*, *revo*. Prefere, por distingi la spiritan agon mem, oni uzas la sufiksoidon *ado*: *pensado*, *sentado*, *revado*.

Esplorante la supre pritraktitajn aĵo-kunmetojn, ni vidas, ke *laŭsence* la aĵo-kunmeto estas esprimebla:

Ĉe produktverboj, rilatverboj, agaplikaj verboj (a, d, e) per *kio estas -ata*, aŭ *-ita* (-ataĵo aŭ -itaĵo).

Ĉe statverboj (b) per *kio -as*, aŭ *-is* (-antaĵo aŭ -intaĵo).

Ĉe alternsubjektaj verboj (c) same per *kio -as*, aŭ *-is* (-antaĵo aŭ -intaĵo).

Rim. II. Kelkfoje, se oni volas marki la *tempon*, oni metas *aĵo-n* post participo; ekzemple: *okazintaĵo*, *okazontaĵo*, *kreitaĵo*, *kreotaĵo* ktp. La analizo okazas laŭ E.: okazinto aĵo, kreito aĵo. *Aĵo* do, kiel epiteto, signas, ke temas ne pri persono (laŭ la lingva konvencio), sed pri objekto, afero.

3. Post *substantivaj radikoj* la signifo de *aĵo* ne povas esti *konkreta manifestiĝo de io nekonkreta*, ĉar la substantiva flankelemento ja mem signifas ion konkretan, do *aĵo* en tiu senco estus pleonasma. Tiaj aĵo-kunmetoj do havas alian analizon.

a) Analizo M. (materialo). Ekzemploj: *lignaĵo*, aĵo el ligno; *sablaĵo*: aĵo el sablo; *vitraĵo*: aĵo el vitro; *tolaĵo*: aĵo el tolo. Se la flankelemento

signifas manĝeblajn beston aŭ materialon, la signifo de *aĵo*, laŭ lingva konvencio, estas *manĝaĵo el...*: *porkaĵo*, *kokidaĵo*, *bovidaĵo*, *ovaĵo*, *sukeraĵo*, *glaciaĵo* (manĝaĵoj el porko, kokido, bovido, ovoj, sukero, glacio).

b) *Aĵo*, ĝuste ĉar ĝi estus pleonasma, povas certigi al si funkcion per tio, ke ĝi donas al la konkreta flankelemento karakteron nekonkretan (kvalitan aŭ agan). Do ĝi kreas nekonkretajn antaŭ si por povi ĝin konkretigi. Ekzemple: *kavaĵo* estas *kav(ec)-aĵo*: konkreta manifestiĝo de kaveco; *infanaĵo* estas *infan-(ad)-aĵo*: konkreta manifestiĝo de (infane agi).

Ekzemploj: 1. *porkaĵo*: pork(ec)aĵo: konkreta manifestiĝo de porkeco (maldececo); *reĝaĵo*: reĝ(ec)aĵo: konkreta manifestiĝo de reĝeco; *francaĵo* (francecaĵo); *latinaĵo* (latinecaĵo); 2. *aranaĵo*: arane(ad)aĵo: konkreta manifestiĝo de la ago de araneo; *azenaĵo*: azen(ad)aĵo: konkreta manifestiĝo de la ago de azeno (stultulo); *porkaĵo*: pork(ad)aĵo: konkreta manifestiĝo de ago de porko (maldeculo). Kiel ni vidas, ofte la kunmetoj estas klarigeblaj dumaniere (per *ec* kaj per *ad*): la esenco estas nur, ke la flankelemento ricevas nekonkretan vortkarakteron.

4. Post *prepozicia* flankelemento *aĵo* funkcias substantivige kaj fiksas, neprigas la konkretan karakteron de la prepozicia substantivo. Ekzemple: *antaŭaĵo*: antaŭo aĵo; *ĉirkaŭaĵo*: ĉirkaŭo aĵo; *anstataŭaĵo*, *kromaĵo*, *subaĵo*, *kunaĵo*, *kontraŭaĵo* ktp.

5. Post *vortkunmetoj* (duobla flankelemento) *aĵo* ligiĝas kiel substantiva epiteto. Ekzemple: *sensencaĵo*: (sen senco)-o-aĵo: konkreta manifestiĝo de senceco; *grandanimaĵo*: (granda animo)-o-aĵo: konkreta manifestiĝo de grandanimeco.

M e m s t a r e ĝia senco estas: *io konkreta*, *sensebla* (objekto, afero) kun nuanco de nedifiniteco.

ECO

329

Eco havas la signifon: *kvalito*. Ĝi estas parelemento de la *kvalita* a-fin-aĵo, kaj estas rigardebla kiel ĝia substantivigo. *Eco* do propre estas *a-o*.

Kiel substantiva ĉefelemento, ĝi postulas antaŭan substantivon, do ĝi substantivigas nesubstantivajn flankelementojn. Ĝi postulas en siaj kunmetoj ĉiam analizon E. Do ĝi estas ĉiam substantiva epiteto de sia flankelemento. Ekzemple: *beleco*: belo eco: belo, kiu estas eco: *belo kiel eco*.

1. Post *adjektivaj radikoj* ĝi signas, ke la abstrakto esprimita de la flankelemento estas rigardenda kiel *kvalito*. *Boneco*: bono, kiu estas eco, *utileco*, *neceseco*, *grandeco*, *blankeco*, *juneco*, *alteco*, *graveco*, *afableco*, *acideco*, *varmececo*, *preteco*, *proksimeco*, *soleco*: utilo, neceso, grando, blanko, junco, alto, gravo, afablo, acido, varmo, preto, proksimo, solo *kiel kvalitoj de iu aŭ io*.

Analizo per adjektivigo de flankelemento estus erara. *Boneco* ne estas *bona eco*. La unua signifas: *bono kiel kvalito*; la dua: *unu bona kvalito*. La diferencon evidentigas jena ekzemplo: *li havas multajn bonajn ecojn, sed ne havas bonecon*.

Rim. I. Inter abstraktaĵoj kaj kvalito ne ekzistas esenca diferenco, sed la lingvuzo – eble pro nacilingvaj influoj – tamen distingas inter kvalito rigardata en si mem kiel abstraktaĵo (*belo, fiero*) kaj kvalito apartenanta al persono aŭ objekto (*ŝia beleco, lia fiereco*). Estas eble, ke iam forviŝiĝos tiu ĉi distingo kaj *-eco* uziĝos nur post neadjektivaj radikoj; sed en la nuna stato de la lingvo la preskaŭ pleonasmaj *eco*-formoj persistas, kaj nur en la poezia lingvo oni ellasas ofte la sufiksoidon *-eco*.

Siavice, estas evitinde uzi la *eco*-formojn, kiam temas ne pri ies kvalito, sed pri abstrakta koncepto. Ekzemple oni povas diri: "mi ĝojas pri la *proksimeco* de via loĝejo; la *alteco* de muro; la *noveco* de la vesto; *antikveco* de libro; mia *soleco* finiĝis", ĉar tie ĉi temas pri kvalito. Sed oni diru: li estas en la *proksimo*; la birdo flugis al la *alto*; li amas la *novon*; en la *antikvo* (antikva tempo); en *solo* ktp. ĉar tie ĉi temas pri abstraktaĵoj. Same malĝusta estas la vorto *eblecoj*; devas esti *ebloj* aŭ *eblaĵoj*. Oni ne diru: *li faris al mi afablecon*; sed: *li faris al mi afablaĵon*. *Malsano* estas la abstrakta koncepto mem: "lia malsano pligraviĝis", *malsaneco* estas malsano kiel ies kvalito: "li ne povis ĉeesti pro sia malsaneco".

Rim. II. Kiel ni vidas, *eco* havas parencan signifon al *esto*: *proksimeco, utileco, malsaneco* estas klarigeblaj kiel *proksim-esto, util-esto, malsan-esto*.

2. Post *substantivaj* radikoj *eco* signas, ke la *konkreta* ideo esprimita de la flankelemento estas rigardata kiel *kvalito*. Ekzemple: *homeco*: homo *eco*: homo, kiu estas *eco*: *homo kiel eco*. Tion oni komprenu jene: La ideo "homo" estas io konkreta; ĉi tiun konkretaĵon distingas certaj kvalitoj: penskapablo, sentkapablo, parolkapablo ktp. Ĉiuj ĉi kvalitoj formas *kvalitkomplekson*, kiun oni povas rigardi ankaŭ abstrakte, ne ligante ĝin al konkreta hom-individuo. Tiu ĉi kvalitkomplekso estas *kvalito homo* aŭ *abstrakto homo*. *Homeco* (homo kiel *eco*) do signifas la kvalitkomplekson homo. Same: *besteco, vireco, amikeco, hejmeco, dieco, tiraneco, heroeco* ktp. esprimas la tutan kvalitkomplekson de la ideoj besto, viro, amiko, hejmo, dio, tirano, heroo ktp.

Ĉe substantivoj esprimantaj parencon, *profesiulon, okupiton, eco* signifas same *kvaliton*. Sed tiu *kvalito* kompreneble tie ĉi estas la *stato* parenca, profesiula, okupitula. Ekzemple: *fianĉeco*: fianĉo kiel kvalito: do ne individuo fianĉo, sed kvalito "fianĉo", stato "fianĉo"; *reĝeco*: reĝo-stato; *patreco*: patro-stato; *geedzeco*: geedzo-stato; *prezidanteco*: prezidanto-stato; *profesoreco*: profesoro-stato; *parenceco*: parenco-stato; *patrineco*: patrin-stato.

Rim. III. Ĉi tiuj formoj do estas analogaj al la simplaj adjektivo-substantivoj (bono, belo, malsano, proksimo ktp.). Por havi formojn analogajn al la adjektivo-*eco*-formoj (*ies boneco, beleco, malsaneco, proksimeco*) oni propre devus duobligi la sufikson *eco* (*ies heroececo, fianĉececo, profesorececo*). Tio tamen estus tute superflua, ĉar, kiel ni jam supre diris, inter *abstrakto* kaj *abstrakto kiel ies kvalito* ne necesas fari distigon.

Oni povas analizi la eco-formojn ankaŭ alivoje. Oni vidis, ke *eco* estas *a-o*, do substantivigo de la *kvalita a-finajo*. *Natureco* do estas *natur-a-o*: (*natura*)-*o*: do: la nomo de la kvalito esprimita per la adjektivo *natura*. Same: *ĝibeco*, *heroeco*, *vireco*, *ftizeco*, *amikeco*, *besteco*, *frazisteco*, *tiraneco*, *dieco*, *hejmeco* estas nomoj de la kvalitoj esprimitaj per la adjektivoj *ĝiba*, *heroa*, *vira*, *ftiza*, *amika*, *besta*, *frazista*, *tirana*, *dia*, *hejma*.

Analizo per adjektivigo de flankelemento estus same erara kiel ĉe adjektivaj radikoj. *Dia eco* estas unu *dia eco*, ekzemple senmorteco, dum *dieco* estas la tuta kvalitkomplekso de dio: kvalito "dio", abstrakto "dio". Do: *dieco konsistas el diversaj diaj ecoj, el kiuj unu estas la senmorteco*.

Rim. IV. Ĉe la substantivoj (kaj adjektivoj) signantaj *aĝon*, oni uzas prefere *aĝo* anstataŭ *eco*: *infanaĝo*, *junaĝo*, *kreskaĝo*, *virnaĝo*, *maljunaĝo*, (*aĝo* de infano, juno, kresko, viro, maljuno). *Infaneco*, *vireco* signifas plie alian kvalitkomplekson ol *aĝon* (konduzmanieron ktp.).

3. Post *verabaj* radikoj plej simple estas analizi laŭ *a-o*. Do: *viveco* estas (*viva*)-*o*: la nomo de la kvalito esprimita per la adjektivo *viva*. *Obeeco*, *dankeco*, *frandeco*, *aparteneco*, *tolereco* estas (*obea*)-*o*, (*danka*)-*o*, (*franda*)-*o*, (*tolera*)-*o*, (*apartena*)-*o*, do kvalitoj (*obea*), (*danka*), (*franda*), (*tolera*). Plej ofte oni uzas la pli precizajn formojn: *obeemo*, *dankemo*, *frandemo*, *toleremo*. En *viveco* la adjektivo (*viva*) havas la sencon *vivplena*.

Ĉar la verbo-adjektivoj povas esprimi ankaŭ pasivan sencon (vd. § 296 B, 2b, c), la analizo de kelkaj verbo-eco-kunmetoj okazas per pasivo. Ekzemple: *korekteco*: (*korekta*)-*o*: (*korektita*)-*o*: kvalito (*korektita*). Same: *fikseco*, *abstrakteco*, *konfuzeco*. Sed oni uzas ankaŭ la participajn formojn: *konfuziteco*, *fiksitateco*, *edukiteco*, *instruiteco*. Ties analizo estas: (*konfuzita*)-*o*, (*fiksita*)-*o*, do kvalito esprimita per la adjektivoj (*konfuzita*), (*fiksita*), aŭ *konfuzito eco*, *fiksito eco*; do *konfuzito*, *fiksito* kiel ecoj; do ne *personoj*, kiel postulus la lingva konvencio, sed *ecoj*, konforme al la adjektiveco de la participo. Plej ofte oni uzas nur la lastan formon (*kaptiteco*, *difiniteco*, *okupiteco* ktp.).

Rim. V. La formoj *estanteo*, *estinteco*, *estonteco* propre ne estas ĝustaj. Ĉar *estanta*, *estinta*, *estonta* estas adjektivoj, ĉe ili *eco* signifas *ies kvaliton*, ne *abstraktan koncepton*. Pli bonaj estus la formoj *estantaĝo*, *estintaĝo*, *estontaĝo*. Sed ankaŭ la mallongaj formoj *estanto*, *estinto*, *estonto*, *pasinto* estas pravigeblaj, ĉar propre *ili* estus la ĝustaj formoj, se la konvencio ne estus farinta escepton ĉe la o-finajaj participoj, signante per *ili*, kontraŭregule, personon. Nu, la lingvo-uzo certe povas sankcii ankaŭ escepton el tiu escepto, kaj ĉe la supraj formoj restarigi la regulan sencon. Plej bone estus havi por tiuj ĉi ideoj apartajn radikvortojn. Por *estonteco* kvazaŭ trudas sin *futuro*, jam "duonoficiala" por la gramatika tempo. Por *estanteo* ni havas la formon *nuntempo* (tempo de nun), por *estinteco* ŝajnas taŭgi la vorto *paseo* (fr. *passé*), kiu ja enhavas la parencsignifan fundamentan elementon *pas*. Komparu: *armi-armeo*; *jubili-jubileo*.

4. Post *prepozicioj* same plej simpla estas analizo *a-o*. Ekzemple: *super-eco*: (*supera*)-*o*, kvalito esprimita per "supera".

Same: *transeco, kontraŭeco, apudeco, antaŭeco, seneco*.

5. Ĉe *unueco* ne estas aplikebla analizo *a-o*, ĉar post numeraloj la a-finaĵo havas specialan signifon de numero. Tie ĉi do ni analizas laŭ VER. I. E.: (unu)-eco: kvalito (esti) unuo; *duco*: kvalito (esti) du. Ĉe *unuaeco* la analizo estas *unua-eco*: kvalito esprimita per la adjektivo "unua".

6. Post vortkunmetoj *eco* signifas, ke la duobla flankelemento estas (ies) kvalito. Ekzemple: *bonkoreco*: (bona koro) kiel kvalito; *facilanimeco*: (facila animo) kiel kvalito. Same: *sensenceco, senkoreco, sendependeco, multrilateco, diverskonsisteco, longhareco*.

P l u f o r m a d o de eco-kunmetoj povas okazi per la a-finaĵo. La senco de la pluformaĵo estas diversa laŭ la diversaj sencoj de la a-finaĵo.

1^a. -rilata, -apartena al *-eco*. Ekzemple: *patreca pruvo*: pruvo de (pri) patreco; *reĝeca edikto*: edikto de (pri) reĝeco; *edzeca atesto*: atesto de (pri) edzeco.

2^a. karakterizita de la *abstrakto*, de la *tuta kvalito* esprimita per *-eco*. Ekzemple: *hejmeca sento, homeca ago, infaneca, vireca, reĝeca konduto*. El tiuj ĉi kunmetoj *-ec-* estas ellasebla, ĉar la a-finaĵo ankaŭ sola povas havi la saman sencon: *hejma sento, homa ago, infana, vira, reĝa konduto*. Ne estas ellasebla la sufikso el *unueca* kaj *soleca*, ĉar *unua* kaj *sola* havas alian sencon.

3^a. karakterizita de unu aŭ kelkaj el la kvalitoj entenataj de la kvalitkomplekso esprimita per *-eco*. Do, laŭ la senco: *-simila, -aspekta, -ŝajna, -maniera*. Ekzemploj: *oleeca fluidaĵo* (simila); *oleeca glito* (maniera); *fraŭleca vivo* de fraŭlino; *vireca konduto* de virino; *japaneca poemo*; *franceca esprimmaniero*; *sableca gusto*; *velureca mano*; *graseca ŝmiriĵo*; *vitrecaj okuloj*; *ligneca papero*; *giganteca efekto*.

Rim. VI. Kun la nomoj de materialo, *-eca* havas ĉiam la signifon 3., neniam la signifon 2., *laneca mantelo* estas mantelo ne el lano, sed el io similanta lanon; *silkeca ŝtrumpo* ne estas silka ktp.

Kelkfoje oni povas ankaŭ tie ĉi ellasi la sufikson *ec*: *olea glito*; *sabla gusto*; *velura mano*. Kelkfoje ĝi estas nepre konservenda: *franceca esprimo*, *japaneca poemo* ktp.

Rim. VII. Por tiu ĉi lasta senco estus konsilinde apliki apartan sufikson, kelkfoje jam provitan, la sufikson *eska*. (Vd. § 353).

M e m s t a r e *eco* estas uzata en la senco de *kvalito*. *Eca* signifas: *kvalita*. *Ece* signifas *kvalite*. *Ecaro* estas *kvalitkomplekso, karaktero*.

Rim. VIII. Oni povus kontesti la substantivan karakteron de *eco*, volante ĝin klasi al la adjektivaj sufiksoj. Sed tio ne ŝajnas oportuna. *Eco* funkcias ja ĉiam kiel substantivigo de la a-finaĵo. Ĝi estas *a-o*. Kaj kiel ni vidis, ĝia pluformado (*eca*) estas analizebla kiel *a-o-a*. Do *teorie* ĝia substantiva karaktero estas plene pravigebla. Kaj *praktike* ĝian substantivan konsideron motivas ĝia analogeco kun *aĵo* kaj *ulo* (vd. § 325).

330

Ulo signifas *individuo, persono, karakterizata de io (abstrakta)*. Kiel substantiva sufikso, ĝi postulas substantivan flankelementon kaj ĝia kunmeto estas analizata laŭ VER. I. E. Do ĝi estas substantiva epiteto de sia flankelemento. Ĝi signas individuon, kies ĉefan, regantan kvaliton esprimas la antaŭa flankelemento, tiel ke la respektiva individuo estas rigardata kvazaŭ *individua manifestiĝo, personiĝo* de la respektiva kvalito. Do ĝi estas analoga al *aĵo*, kiu esprimas la *konkretan* (ne personan) manifestiĝon de kvalito.

Belulo estas *belo ulo*: belo, kiu estas *ulo, belo kiel individuo*.

1. Post *adjektivaj* radikoj do ĝi signas la individuan manifestiĝon de la kvalito esprimita per la adjektivo. Ekzemple: *junulo, feliĉulo, honestulo, obstinulo, avarulo, lamulo* estas individuaj manifestiĝoj, personiĝoj de *juno, feliĉo, honesto, obstino, avaro, lamo*. Por kompreni tion, ni pensu nur pri la esprimoj: *li estas la honesto mem, ŝi estas la belo mem*.

Kelkfoje, en la poezio, oni eĉ ellasas la sufikson. Ekzemple: "*mia belo estis brava juna dano*"²; *mia karo* (Grabowski). Do *belo, karo* povas jam mem signifi personon, sed tia uzo ĝenerala estigus konfuzon. Tial oni simple per la epiteto *ulo* signas, ke temas pri persono: *belo ulo* (belulo), *karo ulo* (karulo).

2. Post *verbaj* radikoj, **ulo** signas, ke la ago esprimata de la verbo estas tiel esenca kvalito de individuo, ke oni lin povas rigardi kvazaŭ *individua manifestiĝo* de la respektiva ago; ekzemple: *timulo*: personiĝo de timo; *drinkulo; estulo; elsaltulo; apartenulo; elĵetulo; rampulo; flatulo*. Kelkfoje oni uzas kunmeton kun participo: *konatulo, instruitulo*; tio estas superflua, ĉar la participa substantivo, per lingva konvencio, jam mem signifas individuon: *konato, instruito*. La solaj esceptoj estus: *estintulo, estantulo, estontulo*. (Vd. § 329, Rim. V.).

Rim. I. Inter participa substantivo kaj *ulo*-formo la diferenco estas la sama, kiel inter la participa adjektivo kaj la a-finaja formo. Ekzemple: *timanto*: timanta homo: homo, kiu (nun) timas; *timulo*: tima homo: homo, kies *esenca trajto* estas timo. (Anstataŭ la simpla adjektivo oni plejofte uzas *ema*-kunmeton: *timema homo*).

3. Post *substantivaj* radikoj **ulo** kondukas same kiel *aĵo*. Por povi individue konkretigi la sencon de la flankelemento, ĝi atribuas al ĝi *abstraktan, nekonkretan karakteron*. Do tie ĉi *ulo* estas *eculo*.

Ekzemploj: *ĝibulo*: ĝibeculo: personiĝo de ĝibeco; *ftizulo, leprulo, almozulo, milionulo, scienculo, vertebrulo, mamulo, kornulo*. Kiel ni vidas el la lastaj tri ekzemploj, *ulo* povas signi en kelkaj kunmetoj ankaŭ *beston*.

Rim. II. Kompreneble post substantivoj signantaj individuon, *ulo* ne devas esti uzata; *ĉefulo, nobelulo, najbarulo, emeritulo* do estas malĝustaj (ĉefo, nobelo, najbaro, emerito). Sed se ni devas doni al la vorto alian sencon, *ul* tamen povas esti uzata. Ekzemple: *fratulo* (frateculo) signifas ne fraton, sed monafion aŭ kunfraton.

Rim. III. La ulo-kunmetoj ordinare signas personon, homestajojn; tamen, escept-okaze, ili povas signi ankaŭ bestojn; *vertebrulo*, *mamulo* (mambesto), *hufulo*, *kornulo*; *amblulo*^Z, *blankulo*, *brunulo* (ĉevaloj); *ruzulo* (vulpo); *murmurulo* (urso); estas tute ne konsilinde uzi -ul por montri planton, malgraŭ la Z-a *neĝborulo*, kaj ankoraŭ malpli pri ŝipoj (*detruulo*). Kiel metaforo pri konstruaĵo, *nubskrapulo* estas akceptebla.

4. Post *prepozicioj* la senco de la ulo-kunmeto estas analoga al la aĵo-kunmeto: *apudulo*, *kontraŭulo*, *superulo*, *subulo*, *anstataŭulo*, *antaŭulo*, *posteulo*. Same post *primitivaj adverboj*: *morgaŭulo*, *hodiaŭulo*, *tieulo*, *tiamulo*. *Duulo* signifas kvazaŭ duan ekzempleron el homo.

5. Post *kunmetoj* (duobla flankelemento) *ulo* signifas personiĝon de la eco esprimita de la duobla flankelemento. Ekzemple: *senharulo*, *facilanimulo*, *senkuraĝulo*, *senfortulo*, *dupiedulo*, *unuhufulo*, *blu- okululo* ktp.

Rim. IV. Unuavide estas strange, ke *timulo* estas la individua manifestiĝo, personiĝo de timo, aŭ ke *ĝibulo* estas personiĝo de ĝibeco. Sed ni pripensu, ke dirante *timulo*, *ĝibulo* ni tute flankenlasas la ceterajn ecojn de la respektivaj individuoj; en la vortoj *timulo*, *ĝibulo* oni diras kaj akcentas sole ilian timon, ilian ĝibecon, do en ĉi tiuj vortoj mem ili konsistas kvalite nur el timo aŭ ĝibeco, en ĉi tiuj vortoj mem ili estas sole kaj nure la individua manifestiĝoj de *timo* aŭ de *ĝibeco*.

Estas vere, ke la ulo-formojn oni povus analizi eble ankaŭ per la adjektivigo de la flankelemento: *belulo*: *bela ulo*; *ĝibulo*: *ĝiba ulo*; *senharulo*: *senhara ulo*. Tio eĉ estus pli simpla kaj malpli teoria. Tamen, la supra strukturo ŝajnas konsilinda el tri motivoj:

1. Alimaniere, *ulo* estus la sola sufiksoido, kiu ne obeas al la vortefikaj reguloj, kaj, kiel substantiva ĉefelemento, adjektivigus sian flankelementon.

2. Per la supra strukturo ni havas plenan analogecon kun aĵo kaj eco (vd. Kategoriosufiksoj: § 331).

3. *Belulo* propre ne estas *bela ulo*. *Ulo* signifas *individuon karakterizatan de ?*, do individuon sen speciala karaktero, personon malgravan, nekonsiderindan. Tial memstare ĝi havas aĉigan nuancon. Tiel ĝi estas ja uzata; ĝi estas preskaŭ insulta vorto. *Bela ulo* do estas senkarakterulo bela, dum *belulo* estas personiĝo de belo. Same: *bela ulino* kaj *belulino*.

ANALOGECO DE LA KATEGORIO-SUFIKSOIDOJ

Resumante, kion ĝis nun ni eksplikis, ni rigardu la rilaton inter la kvar kategoriosufiksoj *ado*, *aĵo*, *eco* kaj *ulo*.

Ni vidis, ke post adjektivaj radikoj la o-finaĵo povas signifi konkreton, abstrakton, personon.

Ni havas do la plursencan formon: aRo: *belo*.

Tiu ĉi estas – laŭ Panel – la *resuma formo*.

Ekzemploj:

Li amas la <i>belon</i>	(abstrakto)
La <i>beloj</i> de la regiono min ravis	(konkreto)
Ŝia <i>belo</i> estis eksterordinara	(kvalito)
Mia <i>belo</i> estis juna dano ^Z	(persono).

Sed tiuj formoj, ĝuste ĉar ili estas plursencaj, estas uzeblaj nur helpe de kunteksto. Por ilin precizigi, ni almetas epitete klarige la respektivajn sufiksojn.

Tiel ni havas formojn ekzaktajn.

Ekzemploj:

belajo: belo aĵo: belo, kiu estas aĵo (konkreto)
beleco: belo eco: belo, kiu estas kvalito (kvalito)
belulo: belo ulo: belo, kiu estas persono (persono).

Do la supraj frazoj, kun formoj ekzaktaj estas:

Li amas la *belon* (abstrakto)
 La *belajoj* de la regiono min ravis (konkreto)
 Ŝia *beleco* estas eksterordinara (kvalito)
 Mia *belulo* estis juna dano (persono).

Same *resumaj* formoj ni povas rigardi ankaŭ la verbosubstantivojn. Ili ja signas unuavice agon, sed povas signifi ankaŭ la konkretan manifestiĝon de la ago.

Ekzemple:

Antaŭ *skribo* demandu min (ago)
 Sigelu la *skribon*^z (konkreto)

Por ricevi ekzaktajn formojn, ni simple almetas epitete klarige, pli-precizige la respektivajn sufiksojn.

Ekzemple:

skribado: skribo ago — nepre ago.
skribaĵo: skribo aĵo — nepre aĵo.

Do la supraj frazoj kun ekzaktaj formoj estas:

Antaŭ *skribado* demandu min (ago)
 Sigelu la *skribaĵon* (konkreto).

II. SUBSTANTIVAJ SUFIKSOIDOJ

ANO

Ano signifas: *apartenulo*. Ĝiaj kunmetoj estas analizataj laŭ VER. I. R.

Ĝia senco en ĝiaj kunmetoj povas esti:

1. m e m b r o; ekzemple: *klubano* (klubmembro); *komitatano*, *akademiano*;
2. l o ĝ a n t o; ekzemple: *landano* (landloĝanto); *urbano*, *vilaĝano*, *budapeŝtano*, *aŭstriano*, *rusujano*, *amerikano*, *insulano*;
3. a d e p t o, d i s ĉ i p l o; ekzemple: *kristano*, *luterano*, *kalvinano*, *gimnaziano* (vd. *isto*);
4. simple a p a r t e n u l o; ekzemple: *ŝipano*, *familiano*, *ŝtatano*, *civitano*.

Ĝi povas havi ankaŭ duoblajn flankelementojn

- a. k u n t e n a j n; ekzemple: *kamparano*, *urbegano* (ano de kamp-aro, urb-ego);
- b. d i s f a l a j n; ekzemple: *samideano*, *samklasano*, *internideano* (ano

de sama ideo, sama klaso, interna ideo).

Homarano estas mallongigo de *homaranismano*.

Baptano signas la rilaton inter baptopatro kaj patro de infano: familiare ĝi signas ankaŭ bonan konaton, homfraton.

M e m s t a r e ĝia signifo estas *membro*: *ano* de klubo, societo, komitato, akademio.

P l u f o r m a d o povas okazi per *i: ani* (funkcii kiel ano); per *igi* kaj *iĝi*: *anigi* kaj *aniĝi* (igi aŭ iĝi ana); per *eco*: *aneco* (membrostato); ankaŭ per aliaj sufiksoj: *anejo*, *anino*, *aneto*, *aniĝilo*, *aniginda* ktp.

ARO

Aro signifas: *kolekto da*. Analizo: VER. I. R. Krome, senclogike ĝi havas ĉiam pluraligan efikon. Do la skemo de ĝiaj kunmetoj estas:

(R-oj)-aro.

En siaj kunmetoj ĝi povas signifi:

a. *ĉ i u j n e n l a m o n d o* el la respektiva speco (ĉiom da); ekzemple: *homaro*, *birdaro*, *bestaro*, *kreskafaro*, *plantaro*, *gazetaro*;

b. *ĉ i u j n k u n a p a r t e n a j n* en difinita unuiĝo: *libraro*, *bildaro*, *estraro*, *amikaro* (amika rondo), *personaro*, *verkaro* (de Tolstoj), *vagonaro*, *foliario*, *beraro*, *hararo*, *dentaro*, *muskolaro*, *ecaro*, *kartaro*, *ŝtuparo*, *arbaro*, *terminaro*;

Rim. *Hararo* komence signifis *perukon*; nun ĝia senco estas kapharoj.

c. *l i s t o n*, *k o l e k t o n* en libro: *nomaro*, *vortaro*, *frazaro*, *prezaro*, *kurzaro*, *horaro* (por trajn-ekiro kaj alveno);

d. *g r e g o n*, *g r u p o n* (post bestonomoj): *brutaro*, *ĉevalaro*, *bovaro*, *ŝafaro*;

e. simple la *p l u r a l o n*: *sentaro* (sentoj), *akvaro* (akvoj), *nubaro*.

Ĝi povas havi ankaŭ duoblajn flankelementojn:

a. *k u n t e n a j n*; ekzemple: *ŝtupetaro* (aro de ŝtupetoj); *ŝnuregaro*, *virinaro*, *maljunularo*, *servistaro*, *vilaganaro*, *komercistaro*, *kortbirdaro*;

b. *d i s f a l a j n*; ekzemple: *altmontaro* (aro de altaj montoj).

Kiel substantiva sufikso ĝi substantivigas sian nesubstantivan flank-elementon; ekzemple: *preĝaro* (aro de preĝoj); *demandaro*, *kantaro*.

M e m s t a r e ĝia signifo estas: *grupo*, *trupo*, *grego*; ekzemple: *aro da homoj* (distingu de *homaro*!); *aro da bestoj*, *arboj*, *birdoj*, *plantoj*, *vagonoj*, *vortoj*.

P l u f o r m a d o: *ara* (grupa); *are* (grupe); *grandare* (granda aro)-e: en granda aro; *ari* (esti ara); *arigi*, *arigi*.

Kp. ankoraŭ: § 33.

EJO

Ejo signifas: *loko*. Analizo laŭ VER. I. R.

Ĝi signifas

1. post *substantivaj* radikoj:

333

334

- a. kie oni ion tenas: *trezorejo, ankrejo, aŭtejo*;
- b. domon: *operejo, oficejo, poŝtejo*;
- c. kie oni ion kulturis (post nomoj de plantoj): *orangejo, ĉerizejo, plantejo*;
- d. kie oni funkcias: *ŝuistejo, ministrejo, episkopejo, dekanejo*;
- e. farejon aŭ vendejon: *cigarejo, tabakejo, ĉapelejo*. Oni plejofte uzas ĉisence la vortojn -fabriko, -farejo, aŭ -vendejo;
- f. stalon (post nomo de bestoj): *ĉevalejo, bovejo, porkejo*.
- g. la lokon de io: *glaciejo* (kie glacio estas); *sablejo, herbejo, fajrejo*.

2. post *verbaj* radikoj: kie la respektiva ago okazas: *ankradejo, forĝejo, gardejo, konservejo, presejo, lernejo, promenejo, juĝejo, preĝejo, lavejo, vendejo, restejo, komercejo, fluejo, renkontejo, draŝejo, haltejo, laborejo, vadejo, kronadejo, gimnastikejo* (ejo de ankrado, forĝo, gardo ktp.). Kiel ni vidas, *ejo* ne atribuas agan elementon al la flankelemento, do ĉe substantivaj radikoj oni devas signi ĝin per *ado* (Kp. *ankradejo, kronadejo* kaj *ankrejo, kronejo*).

3. post *adjektivaj* radikoj *ejo* funkcias substantivige: ekzemple: *malliberejo*: ejo de mallibero; *densejo* (ejo de denso); *vastejo* (ejo de vasto); *malĉastejo* (ejo de malĉasto); *solejo* (ejo de sol[ec]o); *transejo* (ejo de trans[ir]o).

Rim. Kelkfoje *ejo*-kunmetoj estas uzataj ankaŭ abstrakte; ekzemple: *admiralejo* (admiralitato), *ministrejo* (ministerio), *redaktejo* (redakcio).

M e m s t a r e ĝia signifo estas loko. "Dio, mi amas la ejon de Via domo"².

ERO

335 **Ero** signifas: *plej malgranda parto, elemento*. Analizo: VER. I. R. Ekzemploj: *monero, panero, pajlero, grenero, sablero, fajrero, ĉenero, polvero, pulvero, hajlero, sangero* (sangoguto), *larmero* (larmoguto), *pluvero, neĝero* (neĝofloko).

Rim. *Monero* signas nur *metalan* monpecon, sen konsidero pri ties valoro. Pri *papera* monpeco oni diras: *bankbileto*, aŭ *papermono*.

Nesubstantivajn flankelementojn ĝi substantivigas per sia vortefiko. Ekzemple: *steb[er]o* (ero de *steb[aj]o*); *kudr[er]o* (ero de *kudr[aj]o*); *pens[er]o*; *saĝ[er]o*.

M e m s t a r e ĝia signifo estas: tre malgranda parto, elemento, atomo.

P l u f o r m a d o: *ereto, grandera*: (granda ero)-a: konsistanta el grandaj grajnoj; *diserigi, diseriĝi* (dissolvi aŭ dissolviĝi en atomojn; disfal[ig]i; putr[ig]i).

ESTRO

336 **Estro** signifas: *gvidanto, komandanto, ordonanto, direktanto, mastro, ĉefo*.

Ekzemple: *ŝipestro*, *oficestro*, *drinkejestro*, *tablestro*, *poŝestro*, *fakultatestro* (dekano), *guberniestro*, *urbestro*, *vilaĝestro*, *imperiestro*, *regnestro*, *regimentestro*, *rotestro*, *policestro*, *provincestro*, *staciestro*, *grupestro*, *bandestro*.

Nesubstantivajn flankelementojn ĝi substantivigas. Ekzemplo: *laborestro* (estro de laboro), *militestro*, *instruestro*, *centestro* (estro de cento), *dekestro*.

M e m s t a r e ĝi signifas: *gvidisto*, *ordonisto*.

P l u f o r m a d o: *estri* (gvidi, direkti); *estrado* (gvidado); pro la sama forma *estrado* [podio] oni uzas prefere *estreco*; *estraro* (gvidantaro); *estrarano* (ano de la gvidantaro); *estrino*; *estriĝi* ktp.

Rim. Inter *-estro* kaj *ĉef-* ekzistas tiu diferenco, ke *estro* signifas gvidanton, dum *ĉef-* signifas la plej altrangan, povan, grandan inter similaj (*ĉefministro*, *ĉefartikolo*, *ĉefstrato*). Do *bandestro* = *ĉefbandano*.

IDO

Ido signifas:

337

1. filo de... Ekzemple: *reĝido*, *princido*, *sinjorido* (titoloj).
2. juna naskito de... Ekzemple: *ĉevalido*, *birdido*, *hundido*, *kokido*, *porkido*, *ŝafido*, *ranido*; *arbido*, *kreskaĵido*, *plantido* (nur ĉe best- kaj plantnomoj).
3. -deveno (sen konsidero pri aĝo). Ekzemple: *homido*; *Atreidoj*, *Heraklidoj*, *izraelido*, *Nereidinoj*, *Napoleonidoj*, *Karlidoj* (Karo-lingoj), *Levidoj* (Levi-idoj); *latinida* (lingvo).
4. indiĝeno de... Ekzemple: *landido*, *kanaanido*.
5. epigono de... Ekzemple: *Homeridoj*, *Orfeidoj* (Idoj de Orfeo: romano de Bulhuis).
6. salo de halogena acido (ĥemio); ekzemple: *bromido*, *klorido*, *fluorido*.

M e m s t a r e: *filo*, *naskito*, *posteulo*, *disĉiplo*. Ekzemple: *bona patrino mamnutras sian idon*; *idoj de hirundo*; *ni estas idoj de Adamo*; *"Idoj de Orfeo"*.

P l u f o r m a d o: *ideto*, *idino*, *idaro* (gento deveninta de sama praulo; posteularo); *geidoj*.

Rim. Same kiel Zamenhof komence uzis la pseŭdonimon "Esperanto", kiu poste fariĝis la nomo de la lingvo, same Beaufront alprenis la kaŝnomon "Ido", kiu poste fariĝis la nomo de tiu misreformita E-o.

ILO

Ilo signifas plej ĝenerale: io, per kio oni plenumas agon, io por faro de io. Do: *instrumento*, *aparato*, *rimedo* ktp.

338

1. Post verbaj radikoj ĝi signifas

a) ilo de... Ekzemple: *ŝlosilo* (ilo de [por] ŝloso); *kovrilo**, *levilo*, *montrilo*, *portilo*, *borilo*, *tenilo*, *pafilo*, *blovilo*, *ludilo*, *presilo*, *pesilo*, (*pied*)-*gratilo*, *irilo*, *haltigilo*, *ventumilo*, *dormigilo*, *malŝtopilo*, *hakilo*, *segilo*, *kudrilo*, *fosilo*, *tondilo*, *armilo* (per kio oni armas), *lumigilo*, *verŝilo*, *viŝilo*, *purigilo*, *flugilo*, *fajfilo*, *barilo*, *demandilo*, *mendilo*, *aniĝilo* ktp.

b) rimedo, procedo de... Ekzemple: *solvilo* de problemo^z; *abonilo*, *voĉdonilo*, *propagandilo*, *pruvilo*, *komunikilo* ktp.

c) ŝtofo, materialo por... Ekzemple: *kuracilo*, *ruĝigilo*, *kovrilo*, *sanigilo*, *dormigilo*.

d) farilo de... igilo de... Ekzemple: *dormilo* (farilo de dormo), *sanilo*, *lumilo*.

2. Post *neverbaj* radikoj ĝi signifas ĉiam *farilo de*. Ekzemple: *rektilo* (farilo de rekto); *facetilo*, *buterilo*, *fajrilo*, *liniilo*, *angulilo*, *kolorilo*, *sanilo*, *kalibrilo*, *metiilo*, *ĝardenilo*.

3. Malofte, ĝi povas havi disfalajn flankelementojn. Ekzemple: *kontraŭvermilo*: (kontraŭ vermoj)-ilo.

Rim. La *ilo*-kunmetoj estas ofte malprecizaj, ĉar ili montras nur ĝenerale la instrumenton, per kiu la ago okazas, kaj ofte por la sama aŭ simila ago ekzistas diversaj iloj. Tiam oni bezonas apartajn radikvortojn; ekzemple: *kulero* kaj *forko* (manĝiloj), *revolvero*, *fusilo*, *karabeno*, *kanono* (pafiloj), *koverto* kaj *fermo-plato*^z (kovriloj), *pioĉo* kaj *ŝpato* (fosiloj), *stilzoj* (iriloj) ktp.

M e m s t a r e *ilo* signifas *instrumento*, *aparato*, *rimedo*. Ekzemple: "*celo sanktigas la ilojn (helpilojn)*".

P l u f o r m a d o: *ilaro* (ilo-kolekto), *ilujo*, *il-maŝino*, *il-riparo*; *ilejo*, *ilarejo*.

INO

339

Ino signifas: *ano de la koncipanta, naskanta sekso*. La analizo okazas ĉiam laŭ VER. I. E. Do ĝi estas ĉiam substantiva epiteto de sia flank-elemento. *Tajlorino* estas *tajloro ino*.

Kompreneble ĝi povas ligiĝi nur al radikoj signifantaj individuon** (homo aŭ bestan), do preskaŭ ekskluzive al substantivaj radikoj.

* *Kovrilo* estas dusenca: ĝi signifas *ŝtofon* por kovri (speco de tapiŝo), kaj *platon* por kovri (potkovrilo). Por la antaŭa senco oni povus uzi *kovrotuko*^z, sed *kovrilo* jam tiel ekradikis, ke preferu por la dua senco oni uzu *fermo-plato*^z.

**En la familiara lingvo oni jam provis *ino*-formojn ankaŭ por signi virinajn vestpartojn, ekzemple: *ĉapelino* (virinĉapelo), *ĉemizino*, *kalsonino*, *ŝuino*, *ŝtrumpino*, *mantelino* ktp. Pli bonaj ŝajnus: *inĉapelo*, *inĉemizo* ktp.

Ekzemploj: *virino**, *patrino*, *avino*, *filino*, *nepino*, *kuzino*, *fratino*, *homino*, *francino*; *agentino*, *profesorino*, *instruistino* (ina agente, profesoro, instruisto); *konatino* (konato ino), *amatino*; *posedantino*; *belulino* (belulo ino), *karulino*. *Ĉevalino*, *kokino*, *leonino*, *ŝafino*, *hundino*.

Kompreneble, se la radiko mem jam signas virinan estaĵon, *ino* estas superflua. Ekzemple: *amazono*, *primadono*, *meretrico*, *subreto*, *matrono*, *Madono*.

Rim. I. Post viraj nomoj per *ino* oni signas la respektivan *virinan nomon*. Ekzemple: *Paŭlino*, *Juliino*. Por ricevi formojn pli internaciajn, oni povas formi adjektive la virnomojn kaj subkomprenante forlasi la sufikson (Paŭla ino: *Paŭla*). Per analogio oni povas tion fari eĉ tiam, kiam la virina nomo ne havas viran ekvivalenton (Eva, Brigita). Ekzemploj: Ada, Agata, Angelika, Anna, Antonia, Aŭgusta, Baba, Barbara, Berta, Bernarda, Cecilia, Debora, Diana, Dorotea, Dora, Eleonora, Eliza, Elizabeta, Elvira, Emma, Emilia, Eŭgenia, Eva, Flora, Greta, Franciska, Gabriela, Genoveva, Georga, Gertruda, Henrieta, Ida, Irena, Izabela, Iza, Izidora, Johana, Jozefa, Julia, Kamila, Katerina, Klara, Klotilda, Kristina, Laŭra, Lidia, Livia, Lucia, Luiza, Ludovika, Margareta, Maria, Mariana, Marta, Matilda, Monika, Natalia, Ofelia, Olimpia, Paŭla, Pia, Priska, Rebeka, Reĝina, Renata, Roza, Rozalia, Roksana, Sibila, Santa, Sara, Serafina, Serena, Severa, Silvia, Simona, Sofia, Stefana, Suzana, Tekla, Teodora, Tereza, Terezia, Valeria, Veronika, Vera, Viktoria, Vilhelma, Viola, Virginia, Zaira, Zenobia, Zita ktp.

La sola malavantaĝo estus, ke oni ne povas uzi proprajn nomojn en posed-adjektiva formo. Sed la oportuneco de la supraj formoj estas pli grava gajno, ol kia perdo estas la evito de tiuj formoj, malofte uzataj. Cetere, nenio malhelpas diri *Elizabeta epoko*; tiam oni rezignas pri la markado de virineco, sufiĉe evidenta per si mem; ankaŭ *Johana* mano estas nemiskomprenebla, se antaŭe temis pri Johano. Krome estas ĉiam ebla rimedo, uzi sufiksoidon: *Elizabetana epoko*, *Johanina mano*.

Post *adjektivaj* radikoj *ino* malofte ligiĝas. Nur en la poezia lingvo oni povas renkonti la evitindajn formojn *belino*, *karino*. Ilia analizo estas *belo ino*, *karo ino*, do la vortoj estas same aŭdacaj *resumaj* formoj kiel *belo* por *belulo*, *karo* por *karulo*. Sufiĉe ofte oni renkontas la formon *virgino*, anstataŭ *virgulino*, evidente sub la influo de la angla *virgin* kaj de la franca *virginité* – kaj sub la kontraŭinfluo de la franca *virgule* (= komo).

M e m s t a r e ino pro la tro forta aludo al la sekseco, estas uzata nur pri bestoj. Aplikita al homa estaĵo ĝi havas malŝatan nuancon; ekzemple: *ŝi estas nura ino*.

Rim. II. Specialan uzon de *ino* ni trovas en *ŝraŭbino*, kiu montras la enakceptantan parton de la ŝraŭbo (ŝraŭbingo), kaj en *kvinjambino*, *sesjambino*, (Brendon Clark), por montri jamban verson finiĝantan per kroma senakcenta silabo.

* *Viro* tie ĉi estas uzata ne en la senco *ano de la generanta sekso*, sed en la senco: *seksmaturulo*. Por signi *virecan virinon* ekzistas la vorto *virulino*.

Pluformado: *Ina*: 1. apartenanta al la naskanta sekso (ina porko); 2. obsedita de sekseco (ina konduto); 3. rimo finiĝanta per senakcenta silabo (ekz. verbo-perdo). *Ineco*: 1. in-esto; 2. troseksa virineco. *In-seksa*.

Kp. ankoraŭ: § 32.

INGO

340 **Ingo** havas la signifon: tenilo, en kiun oni strikte kaj fikse sed ne plene enmetas objekton, por ĝin firmi aŭ por ĝin uzi pli oportune.

Ekzemploj: *kandelingo*, *cigaringo*, *fingringo*, *glavingo*, *piedingo* (rajdilo), *flamingo* (flamtenilo), *plumingo* (por skribi), *ŝraŭbingo* (por fiksi ŝraŭbon: *ŝraŭbino*); *krajoningo*, *tibiingo* (pli ĝuste: *kruringo*): la krurokovra parto de la boto.

Rim. I. Zamenhof uzis la vorton *pendingo* (tenilo de pendo), por signi ekzekutan pendigilon. Kvankam tie ĉi *ingo* estas uzata en ne propra senco, la vorto havas tradicion kaj ne estas nepre eksterminda. Oni uzas ĉi-sence ankaŭ la vorton *pendumilo* (vd. *um*: § 413). Analoga estas *lumingo*² (tenilo de lumo).

M e m s t a r e *ingo* signifas precipe *ingon de glavo*. Sed ĉiun objekton oni povas meti en ĝian *ingon*.

Pluformado: *Ingi* (eningigi), *malingi* (elingigi).

ISMO

341 **Ismo**, oficialigita de la Lingva Komitato en 1914, signifas:

1. **doktrino**; ekzemple: *budhismo* (doktrino de Budho);
2. **movado**; ekzemple: *kristanismo*, *vegetarismo*;
3. **agmaniero**; ekzemple: *kanibalismo*, *oportunismo*;
4. **sistemo**; ekzemple: *ĵurnalismo*, *punktismo*;
5. **malsana emo** kaj ĝiaj sekvoj; ekzemple: *alkoholismo*, *morfinismo*;
6. **lingva apartaĵo**; ekzemple: *latinismo*, *anglismo*.

Ismo povas esti ligata:

1. Al la nomo de la fondinto de doktrino: *budhismo*, *konfuceismo*; *epikurismo*;
2. Al la nomo de la adeptoj: *kristanismo*, *mahometanismo*, *kanibalismo*, *patriotismo*, *homaranismo*, *anglismo*;
3. Al la verbo montranta la agon: *impresismo*, *protektismo*, *esprimismo*;
4. Al la nomo de ideo aŭ objekto karakterizanta la ismon: *utilismo*, *oportunismo*, *plenaerismo*, *punktismo*, *fetiĉismo*, *kubismo*, *vegetarismo*, *fundamentismo*, *nikotinismo*, *morfinismo*, *esperantismo*; *adatismo* (rimado per *adas-adas*).

M e m s t a r e ĝi signifas: *doktrino*, *movado* (kun iom ironia nuanco); ekzemple: "li estas fanatikulo de plej novaj ismoj".

Isto signifas homon okupiĝantan pri io. Ĝia analizo okazas laŭ VER. I. 1. (isto de...).

A) Post *verabaj* radikoj ĝi signifas:

1. **profesian laboriston**: *faranton de l' ago*; ekzemple: *verkisto, hejtisto, fiŝkaptisto, instruisto, veturigisto, laboristo, pakisto, pentristo, skribisto, redaktisto, ŝtelisto, trompisto, falsisto, rabisto, amist(in)o, akuŝistino* (kiu profesie sin okupas pri aferoj de naskado²), *subakvigisto*.

2. **kutiman** (ofte pasian aŭ obstinan) *faranton de l' ago*; ekzemple: *kolektisto, ĉikanisto, pafisto, mensogisto, murdisto*.

B) Post *substantivaj* radikoj ĝi signifas:

1. **profesia n** okupiĝantan pri io; ekzemple: *dentisto, ŝuisto, maŝinisto, artisto, lignaĵisto, lingvisto, maristo, apotekisto, aŭtisto, juristo, bankisto, ĉambrist(in)o, ĝardenisto, fiŝisto, kupristo, malsanulisto, ŝtatisto, aferisto* (afervigadanto), *karieristo* (ambiciulo, kiu klopodas nur pri sia kariero).

2. **amatoro n**. Ekzemple: *biciklisto, radiisto*.

C) Post *adjektivaj* radikoj ĝi signifas: profesian okupiĝon pri la ideo, kiun signas la substantivigita adjektiva radiko. Ekzemple: *saĝisto* (isto de saĝo), *komikisto, belisto* (estetikisto). Same post prepozicio: *anŝtataŭisto*. *Peristo* devenas el la verbradika *peri* (vd. § 394, Rim. III.).

Rim. I. Ĉar *isto* ne atribuas agan elementon al sia flankelemento, la senco de ĝiaj substantivradikaj kunmetoj estas ofte plursenca. Tial do oni ofte devas uzi pli precizajn formojn anŝtataŭ tiuj formoj *resumaj*. Ekzemple: *fiŝkaptisto, fiŝvendisto, fiŝbredisto* (fiŝisto); *kuprolaboristo* kaj *kuprumisto* aŭ *kuprizisto* (kupristo); same pri *feristo*.

Senfadenisto estas mallongigo de: (senfadena telefonio)-isto.

Rim. II. Ĉe vortoj kun *ismo* oni povas uzi *isto* anŝtataŭ *ismo*. Kompreneble nur tiam, kiam *ismo* ne estas gluita al la nomo de *adepto*; tiaokaze por signi la ismanon, oni revenas al origina vorto (homarano, kristano, patrioto, kanibalo). – Do al *ismo* respondas *isto*. Ekzemple: *budhismo, esperantismo, utilismo, oportunismo, adasismo, morfinismo, vegetarismo, fundamentismo, marksismo*. Tio okazas, eĉ kiam *ismo* ne estas gluita al E-a radiko, sed estas parto de internacia vorto (pseŭdosufikso). Ekzemple: *turismo* (turismo), *monoteismo* (monoteismo), *anarkismo* (anarkismo), *faŝismo* (faŝismo), *pesimismo* (pesimismo), *egoismo* (egoismo).

Rim. III. Ĉe vortoj kun *logio, grafio, nomio, zofio* (nomo de sciencoj) oni povas, anŝtataŭ *isto*, formi la nomon de la scienculo per *logo, grafo, nomo, zofo* (filologo, etnografo, anatomo, filozofo). Atentu! – *fonografo, kinematografo, telegrafo* signifas ilojn! – Same ni povas procedi ĉe la vortoj *rapsodo* (rapsodio), *magio* (magio), *pedagogo, demagogo, dramaturgo, kirurgo, oligarko, monarko, filantropo, mizantropo, diplomato, aristokrato, demokrato, aŭtokrato, burokrato, homeopato, alopato, pederasto, psikiatro, pediatrio, geometro* ktp. – Ankaŭ ĉe vortoj kun *ik* signifantaj sciencon aŭ similan okupon oni povas ricevi la *iston* per la forlaso de la *ik*. Ekzemple: *retoro* (retoriko), *esteto* (estetiko), *skolasto* (skolastiko), *gimnasto* (gimnastiko), *beletristo* (beletristiko), *mimo* (mimiko),

terapeŭto (terapeŭtiko), *didakto* (didaktiko), ktp. – Aliparte, laŭ la ekzemplo de tio, ke *ismo* estas simple anstataŭigebla per *isto*, oni povus anstataŭigi ankaŭ *iko*-n per *isto*. Por ne ricevi nerekonablajn vortostumpojn, oni, tamen, devus tion eviti, kiam la trunko antaŭ *ik* ne estas almenaŭ *dusilaba*. Do restus: *etikisto*, *fizikisto*, *optikisto*, *teknikisto*, *grafikisto*, *muzikisto* ktp. Sed oni havus: *mekanisto*, *botanisto*, *eŭgenisto*, *numismatisto*, *kosmetisto*, *matematisto*, *politisto*, *romantisto* ktp. – Same oni povus anstataŭigi *-io* per *isto* por ricevi jenajn formojn, evitante la pezajn iisto-kunmetojn: *operacisto*, *arbitracisto*, *inkvizicisto*, *kiromancisto*, *tragedisto*, *komedisto*, *parodisto*, *elegisto*, *strategisto*, *historisto*, *ĥemio-ĥemisto-ĥemismo*, *alĥemisto*, *filatelisto*, *evangelisto*.

Oni riproĉis al tiu ĉi solvo, ke ĝi endanĝerigas la aglutinan karakteron de la lingvo*. Tamen, oni povas kontraŭdiri, ke ĉi tie ne temas pri vera fleksio (ŝanĝo), sed pri simpla ellaso pravigebla eĉ per la principo de Necesoj kaj Sufiĉoj. Krome, *botaniko* kaj *botanisto* kun la komuna trunko *botan*, aŭ *komedisto* kaj *komedio* kun la komuna trunko *komed*, estus tute analogaj al *pesimismo* kaj *pesimisto* kun la komuna trunko *pesim*. Oni povas diri, ke ne estas oportune multigi en la lingvo tiujn trunkojn laŭ la ekzemplo de *tur-*, *faŝ-*, *bolŝev-*, *ego-* ktp., al kiuj mankas memstara senco. Sed al tiu oportuna vidpunkto oni povas respondi per alia oportuna vidpunkto, per tiu de belsoneco kaj malpezeco. Kaj la lingvo decidis favore al la lasta vidpunkto ĉe vorto tre ofte uzata en E-o: oni ja diras *filatelio* kaj *filatelisto*. Tiu ĉi ekzemplo montras la supran proponon de solvo ne senŝanca ĉe la estonta evoluo de la lingvo. Ju pli ofte uzata estas vorto, (ekz.~ *mekanisto*), des pli verŝajna estas ĝia ĉi-maniere simpliĝo.

Rim. IV. Inter *-anto*, *-ulo* kaj *-isto* ekzistas tiu diferenco, ke *-anto* signifas fojan, okazan faranton, *-ulo* la personiĝon de la respektiva aga ideo, *-isto* profesiulon. Ekzemple:

trompanto: kiu foje trompas;

trompulo: kies esenca karaktertrajto estas tromp(em)o;

trompisto: kiu vivas per trompo.

UJO

343

Ujo signifas: *entenilo*, *enfermilo*. Analizo: VER. I. 1. Ekzemple: *salujo*: ujo de (por) salo. Ofte ĝi havas pluraligan efikon: *plumujo*: ujo de plumoj.

La ujo-kunmetoj povas havi tri diversajn sencojn, inter si iomete parencajn. Tiuj estas:

I. La senco propra: entenilo, enfermilo. Ĉi-sence ujo povas ligiĝi

a) al substantivaj radikoj; ekzemple: *plumujo*, *cigarujo*, *piprujo*, *salujo*, *supujo*, *paperujo*, *monujo*, *fajrujo*, *abelujo*, *inkujo*, *leterujo* ktp. Por esti pli preciza, oni ofte uzas anstataŭ ĝi vortkunmetojn; ekzemple: *te-skatolo*, *te-kruĉo*, *paperkesto* ktp.;

* Jen probable kial Zamenhof preferis proponi duan formon por la sufikso *-ist-*, kiu fariĝus *-st-* post radikoj finiĝanta per *i*: *farmacisto* (Vd. *Leteroj de Z. I.* pĝ. 316).

b) al *verabaj* radikoj; ekzemple: *banujo* (ujo por bano), *fandujo*, *lavujo*, *knedujo*, *pistujo*, *tenujo*, *konservujo* ktp.

II. -A r b o, -a r b e t o post radiko signifanta *frukton* aŭ *floron*; ekzemple: *pomujo*, *pirujo*, *prunujo*, *vinberujo*, *fruktujo*, *rozujo*; *florujo* ktp. La uzo ĉi-sence pli kaj pli maloftiĝas, oni uzas prefere *-arbo*, *-arbeto*; ekzemple: *pomarbo*, *fruktarbo*, *florarbeto*, *vinarbeto* (vito) ktp.

Ĉe radikoj signifantaj jam mem arbon, kompreneble *ujo* aŭ *arbo* estas pleonasma; ekzemple: *kverko*, *fago*, *pino*. Tamen, oni diras kelkfoje *kverkarbo*, *fagarbo*, *pinarbo*, por akcenti la *individuecon* de arbo.

III. -L a n d o post radiko signifanta *landanon*. (Pluraliga efiko). Ekzemple: *Franцуjo*: ujo de francoj.

La signifo de *-ujo*, en la tria senco, estas ja klara, sed ĝia uzado ne estas simpla kaj ni devas ĝin esplori iom detale.

La nomado de la landoj estas demando kompleksa, ĉar en la naciaj lingvoj mem oni trovas por ĝi du procedojn: jen la landnomon oni derivas el la nomo de la loĝantoj, jen inverse. Kaj tio okazas tute hazarde; ekz-e, en la franca oni havas *Belge* kaj *Belgique* apud *France* kaj *Français*; en la germana, *Deutscher* kaj *Deutschland* apud *England* kaj *Engländer*; en la angla, *German* kaj *Germany* apud *Hungary* kaj *Hungarian*; en la itala, *Greco* kaj *Grecia* apud *Italia* kaj *Italiano*, ktp. Antaŭ tia ĥaoso oni povis trovi du rimedojn: aŭ perfortan simpligon (ekz-e formi ĉiam la popolnomojn el la landnom-radikoj kaj konservi flanke kelkajn ras-nomojn — kio estus, cetere, la plej oportuna solvo), aŭ ordigon kun kiel eble malpleja ŝanĝo de la internaciaj kutimoj. Z., laŭ sia ĉiama pensmaniero, preferis la duan solvon. Tial li elpensis la regulon, ke por la Malnova Kontinento (Eŭropo, Azio kaj la antikve civilizita parto de Afriko) oni formu la landnomon el la popolnomo per *-uj*; male, por la Novaj Kontinentoj (Ameriko, Aŭstralio kaj la cetera parto de Afriko) oni formu el la primitiva land-nomo la popolnomon per *-an*. Laŭ la Z-a sistemo do oni havas la sekvantan liston:

A. Malnova kontinento.

a) Antikva historio: *Egiptujo*, *Asirujo*, *Kaldeujo*, *Etiopujo*, *Sirujo*, *Judujo*, *Persujo*, *Medujo*, *Helenujo*, *Italujo*, *Sabinujo*, *Gaŭlujo*, *Hispanujo*, *Iberujo*, *Germanujo*, *Makedonujo* ktp.

b) Moderna historio: *Abisenujo*, *Afganujo*, *Albanujo*, *Armenujo*, *Azerbajĝanujo*, *Aŭstrujo*, *Belgujo* (*Flandrujo*, *Valonujo*), *Beluĝujo*, *Britujo* (*Anglujo*, *Skotujo*), *Bulgarujo*, *Ĉeĥoslovakujo*, *Ĉinujo* (aŭ *Ĥinujo*), *Danujo*, *Estonujo*, *Franцуjo*, *Germanujo*, *Grekujo*, *Gruzujo*, *Hindujo*, *Hispanujo*, *Hungarujo*, *Italujo*, *Jakutujo*, *Japanujo*, *Jugoslavujo* (*Serbujo*, *Kroatujo*, *Slovenujo*), *Karelujo*, *Katalunujo*, *Kazakujo*, *Kirgizujo*, *Latvujo*, *Litovujo*, *Mongolujo*, *Norvegujo*, *Persujo*, *Polujo*, *Portugalujo*, *Rumanujo*, *Rusujo*, *Svedujo*, *Svisujo*, *Skandinavujo*, *Tagikujo*, *Turkujo*, *Uzbekujo*; krome: *Esperantujo*: lando, unio de esperant(ist)oj; kaj *patrujo* (patrolando).

Rim. I. Ĉe tiuj landnomoj Z. faras jenan distingon: *germano* (ano de la germana raso) kaj *germanujano* (ne-germano, loĝanta en Germanujo).

B. *Novaj kontinentoj.*

a) *Ameriko*: *Azoroj, Argentino, Bolivio, Brazilo* (malpli bone: *Brazilio*), *Ĉilio, Ekvadoro, Gvajano, Gvatemalo, Honduraso, Kanado, Kolumbio, Kostariko, Kubo, Meksikio, Nikaragvo, Paragvajo, Peruo* (ankaŭ *Peruvio*), *Salvadoro, Urugvajo, Venezuelo* ktp.

b) *Afriko*: *Alĝerio, Angolo, Dahomeo, Ganao, Gvineo, Kablando* (ankaŭ *Kaplando*), *Kameruno, Kanarioj, Kenjo, Kongolo* (ankaŭ *Kongo*), *Liberio, Madejro, Maroko, Mozambiko, Natalo, Nigerio, Njasalando, Rodezio, Sud-afriko, Tanganjiko, Tanzanio, Togo, Transvalo, Tunisio, Ugando, Zairo, Zambio* ktp.

c) *Oceano*: *Aŭstralio, Borneo, Havajo, Novzelando* (*Nova Zelando*), *Papuo, Tahito, Trinidado* ktp.

Rim. II. La nomoj de la Nord-amerikaj Unuigitaj Ŝtatoj mem estas parte asimilitaj: *Alabamo, Kalifornio, Kolorado, Georgio, Nebrasko, Ohajo, Virginio* ktp., parte konservas la originan formon: *Massachusetts, Rhode Island, Tennessee* ktp. (eble: *Masaĉuzeco, Tenesio*).

Rim. III. Kiel oni vidas, laŭ Z-a propono, la landoj kun samnoma ĉefurbo aŭ rivero estas distingitaj per *-io*: *Alĝerio* (*Alĝero*, urbo), *Meksikio* (*Meksiko*, urbo); *Nigerio* (*Nigero*, rivero); *Senegalio* (*Senegalo*, rivero). Konforme al tio: *alĝeriano* kaj *alĝerano* ktp.

C. *Esceptoj.*

La supran sistemon Z. pravigis per tio, ke en la Malnova Mondo la nomon al la landoj donis ties posedanto, dum en la Nova Mondo okazis inverse. Tio estas plej ofte trafa, sed tamen, la sistemo suferis plurajn esceptojn:

1. Kelkfoje la landnomo en kategorio A. tamen ne estas devenigebla el la popolnomo. Tia estus la okazo ankaŭ ĉe *Svislando, Ĉinlando* kaj *Egiptlando*, ĉar ili devenas el urbnomoj (*Schwytz, Tsin* kaj *Hai-ĥu-Phtah*); tamen tio hodiaŭ jam ne estas tiel sentata, ke oni ne povus uzi la supre donitajn formojn. Male estas ĉe *Babilonio, Birmo, Cejlono, Heĝaso, Irako, Irano, Israelo, Jemeno, Liĥtenŝtejno, Luksemburgio, Moldvo, Monako, Nepalo, Pakistano, Palestino, Siamo, Siberio, Sovetio, Tibeto, Ukrainjo, Vjetnamo*, kiuj, kvankam apartenantaj al la kategorio A., ne estas esprimeblaj per *-ujo*.

2. Kompreneble, la Z-a sistemo ne aplikiĝas al la novaj federacioj de landoj, ĉu ili forĝis novan nomon (*Benelukso* = Belgujo, Nederlando, Luksemburgio), ĉu ili simple uzas mallongigojn: USSR (Unio de la Sovetaj Socialistaj Respublikoj), AUR (Araba Unuiĝinta Respubliko), USA (Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko: oni scias, ke por tiu lasta lando, la esp-istoj uzas ordinare la nomon *Usono*, el la plena formulo: United States of North America).

3. Ĉe la antikvaj landoj oni uzas prefere la internaciajn formojn, laŭ la 15a regulo de la F. Gramatiko: eĉ Zamenhof tion faris pri kelkaj:

Asirio^z, *Fenicio*^z, *Mezopotamio*^z, *Samario*^z, *Sirio*^z; *Britanio*, *Gallio*, *Ĝermanio*, *Iberio*, *Italio*, *Hispanio*, *Medio*, *Persio*.

4. Kiam la internacia landnomo jam finiĝas per *-lando*, ŝajnis neebla aldoni la sufikson *-uj*. Tial oni ĉe tiaj nomoj aplikas la saman derivadon, kiel ĉe la nomoj de la novaj kontinentoj: *Grenlando* (aŭ *Gronlando*) (-ano), *Irlando* (irlandano), *Islando*, *Jutlando*, *Laplando*, *Nederlando* (*Holando*, *Frislando*), *Tajlando*, *Nov-Zelando* ktp.

5. Ĉe kelkaj aliaj landnomoj, oni kutime anstataŭigas la sufiksoidon *-ujo* per la vorto *-lando*, ĉar tio pli bone respondas al la nacilingva formo; sed la popolnomo restas tamen la primitiva radiko: *Britlando* (brito), *Finnlando* (finno), *Greklando* (greko), *Hungarlando* (hungaro), *Ruslando* (ruso), *Skotlando* (skoto), *Svedlando* (svedo), *Svislando* (sviso).

6. Fine, ĉe kelkaj aliaj landoj, kiuj formiĝis post la milito, oni pli kaj pli uzas la internacian nomon finiĝantan per la finaĵo *-io*; tiam la popolnomo deriviĝas el ili: *Aŭstrio* (aŭstriano), *Ĉeĥoslovakio* (-ano), *Indonezio* (-ano), *Jugoslavio* (-ano). Sed oni trovas por la popoloj ankaŭ jenajn nomojn tradiciajn: *aŭstro*, *ĉeĥoslovakio*, *jugoslavo*; tiel, ke la finaĵo *-io* ŝajnas sufiksoido samsenca kiel la fundamenta *-ujo*. Pri la sufiksoido *-io*, vd. § 344.

D. Provincnomoj.

Ĉe ili regas la sama malordo: jen la nomo de la provincano estas la primitiva vorto, jen tiu de la provinco. Jen la listo de la ĉefaj provincoj: ni grupigos ilin laŭ du fakoj, unue la primitivajn, due la pluformitajn nomojn:

Britujo:

1) kelkaj nomoj de graflandoj estas facile asimileblaj: *Kornvalo*, *Kumberlando*, *Jorkio*, *Norfolko*, *Northumberlando*; aliaj estas uzataj prefere en la origina formo, ol en la parenteze donita: *Lancaster* (Lankastro), *Gloucester* (Glostrio), *Worcester* (Vustrio), *Surrey* (Surio) ktp.

2) *Kimrujo* (kimro); *anglosakso*.

Francujo:

1) *Alzaco* (-ano), *Anĵuo*, *Ardenoj*, *Artezo*, *Arverno*, *Burgundio* (aŭ *Burĝonjo*), *Ĉampanio* (aŭ *Ĉampanjo*), *Delfinio*, *Langvedoko*, *Limozio*, *Loreno* (aŭ *Lotaringio*), *Parizio*, *Provenco*, *Puatujo* (aŭ *Piktavo*, *Piktuo*), *Turanĝo* (aŭ *Tureno*), *Vendeo* ktp.

2) *Bretonujo* (bretono), *Flandrujo*, *Gaskonujo*, *Normandujo*, *Pikardujo*, *Vaskujo*.

Germanujo:

1) *Brandenburgo*, *Hanovero*, *Meklenburgo*, *Oldenburgo*, *Pomeranio*, *Rejnlando*, *Silezio*, *Ŝlesvigo*, *Turingio*, *Vestfalia*, *Virtenbergo* ktp.

2) *Bavarujo* (bavaro), *Frankonujo*, *Prusujo*, *Saksujo*, *Svabujo*.

Italujo:

1) *Abruzo*, *Emilio* (-ano), *Kalabrio*, *Kampanjo*, *Ligurio*, *Piemonto*, *Romanjo*, *Sardinio*, *Savojo* ktp.

2) *Apulujo* (apulo), *Lombardujo*, *Toskanujo*.

Aliaj landoj:

1) *Anatolio* (-ano), *Andaluzio*, *Aragono*, *Besarabio*, *Bosnio*, *Bukovino*, *Galicio*, *Hercegovino*, *Istrio*, *Karintio*, *Kastilio*, *Kaukazio*, *Krimeo*, *Montenegro*, *Stirio*, *Tirol*, *Transilvanio*, *Volgio* ktp.

2) *Baskirujo* (baskiro), *Dalmatujo*, *Makedonujo*, *Moravujo*, *Tatarujo* ktp.

Pri la urbnoj vd. § 36.

IO

344

Io estas:

1. Zamenhofa sufiksoido, por formi la nomon de la lando el samnoma ĉefurbo aŭ rivero: *Meksikio*^z; *Tunisi*^z; *Alĝerio*^z; *Nigerio*, *Transdanubio*, *Jorkio* ktp. Tiaokaze ĝi do havas la sencon *-lando*: *Meksiklando*, *Nigerlando*.

2. Neoficiala sufiksoido, por formi la nomon de lando el la nomo de landanoj. Post antaŭaj sporadaj provoj, ĝin proponis Hector Hodler, ĝeneraligante la internaciajn formojn *Aŭstrio*, *Germanio*, *Hispanio*, *Italio*, *Skandinavio* ktp. ankaŭ por la nomo de aliaj landoj: *Belgio*, *Britio*, *Grekio*, *Polio*, *Japanio*, *Ĉinio* ktp. Do *io* laŭ tiu propono estas anstataŭigo de la triasenca *ujo* (vd. tie) kaj uzenda laŭ la samaj reguloj.

Oni vidas, ke tia uzado de *-io* estas nur plivastigo de ties Z-a apliko (vd. punkto 1.). Estas sendube, ke ĝi troviĝas en multaj internaciaj formoj, do ekz-e *Hungario*, *Italio* ktp. estas uzablaj laŭ la 15-a regulo de la Fund. Gram. Etendi la uzon de *-io* ankaŭ al aliaj landoj (Belgio, Britio ktp.) povas okazi per analogio, grave rolanta en ĉiuj lingvoj. Aliflanke, la plia rekonebleco internacia estas ĉe la landnomoj multe pli grava ol cetere. Kaj, eĉ kie la formo ne estas internacia, *-io* malpli deformas la vortojn ol *-ujo*. Krome: *-io* estas nur aldono, anstataŭanta la trian sencon de *-ujo*, same kiel *aĉ* anstataŭas unu el la du sencoj de *fi-*; poste, ĝi povas esti (kaj *estas*) paralele uzata kun *-ujo*, sen ia miskompreno. Do ĝi plene plenumas la postulojn, kiujn Z. metis en la Antaŭparolo de la Fundamento pri enkonduko de novaĵoj.

La propono, pro siaj evidentaj avantaĝoj, estis favore akceptita de granda parto de l' E-istaro. Ĝian ĝeneralan akcepton, tamen, malhelpis la rifuzo de la Lingva Komitato, kiu decide en Februaro 1922 "malkonsilis" la uzon de la nova sufikso. Sed, krom multaj neŭtraluloj, ĉiuj laboristaj rondoj plu uzadis la *io*-formojn, vastigante ĝin eĉ ĉe nomoj, kiuj tute ne bezonis ĝin, ekz-e *Kanadio* ktp. Tio estas la motivo, kial en 1974 la Akademio, konsiderante, ke la tiama Lingva Komitato bazis sian decidon sur la konstato de la tiutempa uzado, kaj ke tiurilate la cirkonstancoj ŝanĝiĝis, deklaris, "ke la okazo de la sufikso *-io* apud la Fundamenta *-ujo* por ricevi pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de la Zamenhofa metodo, kaj, nuligante la antaŭan mal-

konsilon de la Lingva Komitato, sed ne ŝanĝante ĝin al rekomendo, lasas al la ĝenerala uzado libere decidi pri la venko de la pli oportuna formo.” (“Aktoj de la Akademio, II.” p. 14).

3. Neoficiala sufikso por formi nomon de scienco, okupiĝo, aŭ spirita direkto el la nomo de scienculo aŭ reprezentanto de direkto. Ekzemple: *biologo-biologio*, *filozofo-filozofio*, *geografo-geografio*; *demokrato-demokratio* ktp. Vd. *isto*, *iko*.

En la tria senco *-io* estas nur pseŭdosufiksoido, ĉar ĝi ne estas ekskluzive uzata (kp. *poetiko*, *retoriko*, *skolastiko*, *didaktiko* ktp. kun *ik*). Oni povas diri, ke la respektivajn vortparojn (*biologo*, *biologio* ktp.) oni sentas apartaj radikvortoj ne devenigitaj unu el la alia. Tamen, tiu reguleco ekzistas en tiel granda serio da vortoj, ke ni pritraktis ĝin ĉi tie, ĉar la tasko de gramatiko ja estas malkovri regulecojn en la lingvo.

4. Neoficiala sufikso, formanta nomon de floro el la nomo de la dediĉato aŭ kreinto: *dalio* (el Dahl), *kamelio* (el Camelli), *hortensio* (el Hortense), *fukcio* (el Fuchs) ktp.

IKO

Iko estas neoficiala (pseŭdo-)sufiksoido, por formi la nomon de *scienco*, *okupiĝo* ktp. el la nomo de la respektiva isto. Ekzemple: *poeto-poetiko*, *stilisto-stilistiko*, **gimnasto-gimnastiko*, **mimo-mimiko*. Ĝi estas propre samsignifa kun *-io* 3. (vd. tie), per kiu, el la vidpunkto de reguleco, ĝi estus eĉ anstataŭigebla: **poetio* ktp. Aŭ, inverse, oni povus uzi *iko* anst. *-io*, dirante **biologiko* ktp. Tamen, la vidpunkto de internacieco ŝajnas esti pli grava tie ĉi. Vd. *isto*, kaj § 362.

Rim. En la vortoj *dinamiko*, *muziko*, *optiko* ktp. *iko* estas apartenaĵo de la radikoj.

345

ITO

Ito estas neoficiala sufiksoido, por formi la nomon de *inflamo*, *brulumo* el la nomo de *organo*. Plej ofte ĝi estas pseŭdosufikso, ĉar la organoj, pro internacieco, estas signitaj en ĝiaj kunmetoj ne per E-a, sed per greka nomo: *nefrito*, *oftalmito*, *gastrito*, *derm(at)ito*, *encefalito*, *enterito*, *endometrito*. Ĝia sufiksa funkcio do evidentiĝas nur ĉe la vortoj, kie ĝia kunmeto kun E-a radikoj identas kun la internacia formo: *bronkito*, *apendicito*, *laringito*, *pleŭrito*, *ostito*.

Rim. La vorto *fundamentito* estas ne tre ĝusta, ĉar la fundamento ne estas *bruluma organo* de la troa ortodoksulo. *Fundamentozo* ŝajnus pli akceptebla (Vd. § 356).

Ankaŭ en la kemio uziĝas la sufiksoido *-it-*, kune kun *-at-* menciata tie ĉi. La nehalogenajn acidradikojn oni signas per *-at-*, kaj se ili havas variaĵojn kun malpli da oksigeno, ĉi tiun oni signas per *-it-*: *sulfita acido* (H_2SO_3), *fosfita acido* (H_3PO_3); *natrio sulfata* (Na_2SO_4), *kalio fosfata* (K_3PO_4), *natrio sulfita* (Na_2SO_3). Kiel oni vidas, antaŭ la sufiksoidoj oni mallongigas la nomon de kelkaj elementoj.

346

III. ADJEKTIVAJ SUFIKSOIDOJ

ECA

- 347 La sufiksoidon eca ni povas rigardi pluformado de la kategorio-sufiksoido eco. Vd. tie (§ 329).

EBLA

- 348 Ebla signifas: *taŭga por esti -ata*. Ĝi do ĉiam atribuas *agan* karakteron kaj *pasivan* sencion al sia flankelemento.

Ekzemple: *legebla* (taŭga por esti legata); *farebla*, *videbla*, *fleksebla*, *komprenebla*, *manĝebla*, *impresibla*, *nerezistebla*, *rulebla*, *dubebla*, *penetrebla*, *memorebla*, *anstataŭebla*, *nesuperebla*; *martelebla* (taŭga por esti martelata), *facetebla*, *nomebla*, *nenombrebla*, *formebla*, *ord-ebla*, *regulebla*, *signebla*, *fabrikebla* ktp.

Ĝi povas atribui pasivan sencion kelkfoje eĉ al verboj ne-transitivaj: *irebla* vojo, *nekuŝebla* lito, *nesidebla* seĝo; sed nur, kiam la verbo povas havi rektan komplementon en E.: iri vojon, kuŝi liton, sidi seĝon. Aliokaze la verbon oni devas transitivigi per *ig*: *bruligebla*, *faligebla*, *dronigebla*. La person-suplementon enkondukas ne *de*, sed *por*: *nefarebla por infano*.

M e m s t a r e: *ebla* (farebla); *eble* (povas esti); *eblo* (eblaĵo: kion oni povas fari).

P l u f o r m a d o: *ebleco* (mi miras pri la ebleco de tio); *eblaĵo* (vi ne havos eblaĵon paroli); *eblig* (igi ebla); *eblig* (iĝi ebla); *malebla* (ne ebla); *malebleco*, *maleblig*, *maleblaĵo*; *laŭeble* (laŭ eblo); *neebla*, *neblig*; *plejeble*: (pleja eblo)-e: laŭ pleja eblo: kiel eble plej. Pri *reven-eblaĵo* vd. § 323.

EMA

- 349 Ĝia signifo estas: *inklina*. Analizo: VER. II.: *ema je -o*. Tamen, ĉar oni inklinas plej ofte al *ago*, ĝi plej ofte atribuas *agan* karakteron al ne-verbaj radikoj, do estas analizebla: *ema je i-o*.

Post verbaj radikoj ĝi signifas:

1. i n k l i n a j e...; ekzemple: *amema* (ema je amo), *dormema*, *ĝeniĝema*, *mensogema*, *mordema*, *timema*, *dankema*, *helpema*, *kom-prenema*, *fleksigema*, *servema*, *fidema*, *ordonema*, *legema*, *riskema*, *vengema*, *ŝanĝema*, *observema*, *kaŝema*, *kaŝigema*.

2. p o v a j e...; ekzemple: *eksplo-dema*, *decidema*, *divenema*, *trovema*, *inventema*, *produktema*, *sentema*. En tiu ĉi senco lastatempe oni renkontas ankaŭ la sufikson *iva* (eksplo-diva, produktiva, sentiva).

3. m i n a c a t a d e...: s u b l a d a n ĝ e r o d e...; ekzemple: *mortema*, *falema*, *erarema*, *vomema*, *rompigema*. Kp. § 362.

Post adjektivaj radikoj ĝi substantivigas la flankelementon: *malsanema*: ema je malsano. Ankaŭ tie ĉi ni retrovas la suprajn sencojn: *purema*, *entuziasmema*, *kontentema*, *precizema*, *verema*, *sincerema* ktp. Oni povas

ilin analizi ankaŭ per verba flankelemento: *purema* (ema puri: ema je purado), *entuziasmema* (ema entuziasmi: ema je entuziasmado) ktp.

Post *substantivaj* radikoj ĝi kelkfoje ligiĝas sen aga elemento intera; ekzemple: *Esperantema*: ema je Esperanto; *gastema*: ema al gasto. Sed tiaj vortoj estas prefere evitindaj; oni uzu ĉi-okaze kunmetojn kun *ama*; ekzemple: *bestama*, *gastama*, *florama*, *muzikama*. Sed oni povas uzi *-ema*, kiam la analizo povas okazi ankaŭ per verbo aŭ per *ado*; ekzemple: *ordema* (ema ordi), *dogmema* (ema dogmi), *fiŝema* (ema fiŝi), *gastema* (ema gastigi; do *ne* esti *gastigema* aŭ *gastama*), *logikema* (ema logiki), *sciencema* (ema scienci), *florema* (ema flori), *esperantema* (ema esperanti: okupiĝi pri E-o), *bagatelema* (ema bagateli). La samo rilatas ankaŭ al adjektivaj radikoj: *verama* estas pli bona ol *verema*; *belema* estas, kiu volas esti bela (ema beli), *belama* estas amanta la belon.

Rim. I. Inter *-ema* kaj *-anta* estas proksimume la sama diferenco kiel inter *-ulo* kaj *-anto* (vd. ist).

Rim. II. La *ema*-kunmetoj ĝenerale signas *konstantan* karakterizan inklinon: *mangema*, *drinkema*, *dankema* (okazan emon al danko esprimas *danka*). Tamen, kelkfoje oni uzas ilin ankaŭ en senco okaza: *mi estas dormema*. Neces-okaze oni povas nepriki la okazan senco per la uzo de *senti* aŭ *havi* kun *-emo*: ekz-e: *senti vengemon*, *havi timemon*.

M e m s t a r e: *ema* (inklina); *emo* (inklino); *emi* (inklino).

P l u f o r m a d o: *emigi*, *emiĝi*.

Rim. III. En la fruaj tempoj de E-o oni uzis la formon *-emo* plej ofte kun *-eco* (*drinkemeco*, *dormemeco*, *helpemeco*). Tiu pleonasmo preskaŭ tute malaperis el la lingvo.

ENDA

Enda, oficialigita de la Akademio en 1953, havas la senco: *kiu devas esti -ata pro materia aŭ morala trudo; kiun oni estas devigata -i*. Do ĝi ĉiam atribuas al sia flankelemento agan karakteron kaj pasivecon.

350

Ekzemple: *skribenda tasko*, *sekvenda regulo*, *lernenda leciono*, *pagenda ŝuldo*, *plugenda kampo*, *memorenda recitaĵo*, *martelenda fero*, *brosenda vesto* ktp.

Rim. Inter *-inda*, *-ota* kaj *-enda* estas tiu diferenco, ke *-inda* esprimas valorprijuĝon, *-ota* intencan aŭ destinitecon, *-enda* ordonon. Ekz-e *detruinda* (kiu meritas detruigi), *detruota* (kiu - eble - estos detruata), *detruenda* (kiun oni estas devigata detruui).

M e m s t a r e: *enda*: deve farota (*tuj respondi estas ende; ties liverado estas enda*); *endo*: io neevitebla; *endas*: oni nepre devas (*endas tuj fari sangnan transverson*); *endeco*: neceseco.

INDA

351 **Inda** signifas proksimume: *merita je...* Analizo: VER. II.

Plejofte ĝi ligiĝas al verbaj radikoj: *aminda* (inda je amo), *admirinda*, *mirinda*, *fidinda*, *penrinda*, *suspektinda*, *memorinda*, *hontinda*, *peninda*, *bedaŭrinda*, *kompatinda*, *kredinda*, *plorinda*, *ĝojinda*.

Kelkfoje al substantivaj radikoj; ekzemple: *kroninda* (inda je krono), *prezinda* (inda je prezo).

Pro sencparenceco ĝi signifas kelkfoje: *kio devas esti farata*; ekzemple: malsano *kaŝinda* por la mondo^Z; *nefarinde*^Z; tio estas *konsiderinda* (oni devas ĝin konsideri). Vd. *enda*, *ota* (§ 350, Rim.).

M e m s t a r e: *inda* (meritanta); ekz-e: *inda* je puno, amo, preparolo, laŭdo; ne estas *inde* paroli pri tia bagatelo; filo *inda* je sia patro^Z; *indo:* (inda)-o; ekzemple: *ridindo*, *punindo*; plej ofte oni uzas ĝin kun *eco:* *ridindeco*, *punindeco*. **M e m s t a r e:** 1. *valoro:* mia vivo ne havas por mi *indon*^Z; 2. *merito:* oni rekonis lian *indon* pri tiu ĉi afero; 3. *respektindeco:* ĉi-sence nun oni uzas *digno*. *Indi:* *esti* inda, meriti; ekz.: la afero ne *indas* penon. *Indigi:* igi inda. *Malinda:* senmerita, nerespektinda. *Senindulo.*

ALA

352 **Ala** propre estus ne sufiksoido, cetere neoficiala, sed adjektivo derivita el la prepozicio *al*, laŭ la formo de *ĉirkaŭa*, *apuda* ktp. Ĝia signifo estus *rilata al*, *apartena al*.

Sola neceso pri ĝi ekzistus ĉe adjektiva pluformado de adjektivradikaj substantivoj. Tie laŭ analizo VER. II. (ala je -o) ĝi substantivigas sian flankelementon, do anstataŭas substantivigan sufikson.

Ekzemploj: *varmala* radio, *fortala* efiko, *acidala* radikoj. Ĉe la komuna lingvouzo ĝi estas nenecesa.

ESKA

353 **Eska**, nova neoficiala sufiksoido: *-simila*, *-maniera*. Ekzemploj: *fraŭleska* vivo de virino; *vireska* virino; *japaneska* pentraĵo; *italeska* prononco; *danteska* esprimo; *fosforeski*, *fluoreski*. Ĝi povus servi ankaŭ por signi kolornuancojn: *blueska* (blueta, dube-blua); *verdeska vitro* (proksimume verda); *nigreskaj strioj sur la neĝo*. (Vd. §§ 329, 362).

IVA

354 **Iva** estas neoficiala sufiksoido, kies signifo estas *-pova*, *-kapabla*. Ĝi do estas analoga al *-ebla*, sed atribuas aktivan sencon al sia flankelemento. Ekzemple: *produktiva*, *sentiva*, *decidiva*, *pagiva* (solventa), *impresiva*, *elvokiva*.

Iva povus tre bone esti uzata ĉe verboadjektivoj, kiun la lingvouzo kutime aplikas en pasiva senco. Ekzemple: *ĉagreniva*, *konfuziva*, *kons-*

terniva. Sentante la neceson de distingo, oni ofte uzas ĉe tiuj vortoj malĝuste la sufikson **ig** por senco aktiva: *konfuziga, ĉagreniga, kons-terniga*.

Krome ĝi helpus pri la konfuzo montrita en § 323, Rim. III (*venk-ebleco-venkiveco*).

OIDA

Oida estas neoficiala sufiksoido, uzata preskaŭ ekskluzive en la teknika lingvo. Ĝi signifas: - f o r m a: *arboida, koroida*.

355

Pro praktikaj konsideroj, la senpera substantivigo de *-oida* estas uzata ne en la senco: k v a l i t o, sed en la senco: o b j e k t o: *metaloido, asfodeloidoj, katoidoj, sciuroidoidoj, rimoido, sufiksoido, prefiksoido*.

Ofte ĝi estas pseŭdosufiksoido: *antropoido, asteroido, celuloido*.

OZA

Oza estas neoficiala sufiksoido, lastatempe kelkfoje uzata por anstataŭi la iom pezajn kunmetojn kun **-plena** kaj **-riĉa**. Ekzemple: *poroza* (multpora), *sabloza, oroza, karboza, sukoza*. Oni rajtas ĝin uzi nur post substantivaj radikoj por signi *materian* multhavecon. Ĉe adjektivaj kaj verbaj radikoj ĝin anstataŭas **ega** (*kuraĝega, ne kuraĝoza*).

356

En la medicina lingvo ĝi havas tri signifojn:

1° patologia troo: *acidozo, alkalozo, leŭkocitozo*;

2° malsano nomata el la nomo de la parazito: *leptospirozo, aspergilozo, toksoplasmozo*;

3° perturbo de funkcio de organo: *nervozo, psikozo*. Ofte cetere ĝi estas pseŭdosufiksoido: *sklerozo, trombozo, mikoza, artrozo, nefrozo, neŭrozo*.

Rim. La malsanojn (sub 2°) la medicina nomenklaturado multfoje esprimas per **-iasis** (*amoebiasis, ascaridiasis*); la Medicina Vortaro de Briquet uzas ankaŭ ĉi-okaze la sufiksoidon **-ozo**: *amebozo, askaridozo*.

En la kemio **-oza** havas specialan signifon: ĉe metaloj, kiuj povas eniri en kombinojn laŭ du difinitaj valentoj, ĝi signas, ke temas pri la malpli granda valento: *feroza sulfato* (FeSO_4), *kuproza oksido* (Cu_2O). La pli grandan valenton signas **-ika**: *ferika sulfato* [$\text{Fe}_2(\text{SO}_4)_3$], *kuprika oksido* (CuO).

IV. VERBAJ SUFIKSOIDOJ

ADI

Ĉar **-adi** povas esti rigardata kiel pluformado de **ado**, ni pritraktis ĝin sub la kategorio-sufiksaj (vd. § 326).

357

358

La signifo de igi estas: *fari -a, fari, ke io estu -a*.

Analizo: VER. III. 2. Do la flankelemento estas ĉiam *predikata adjektivo*.

Igi povas ligiĝi al adjektivaj, substantivaj kaj verbaj radikoj, sed la neadjektivajn radikojn ĝi adjektivigas per sia vortefiko.

1. Post **s u b s t a n t i v a j** radikoj do ĝia analizo estas: oRa-igi: *igi oRa*. Ekzemple: *reĝigi*: igi reĝa.

La tiel estiĝintaj substantivo-adjektivoj povas havi ĉiujn senceojn signeblajn per la finaĵo -a (vd. § 296).

a) *kiu estas -o*. Ekzemploj: *reĝigi*: igi reĝa (reĝo); *ruinigi*: igi ruina (ruino); *gastigi, edzigi, edzinigi, fianĉigi, ringigi*;

b) *kiu estas el -o*. Ekzemple: *ŝtonigi*: igi ŝtona (el ŝtono); *buterigi, kazeigi, korpigi, vaporigi, ŝtaligi, neniiĝi*;

c) *karaktizata de -o*: -o-kvalita aŭ -o-hava; ekzemple: *pintigi* (igi pinta); *flamigi, fruktigi, paciĝi, amasigi, rajtigi, naturigi, publikigi* (igi publika), *vicigi* (igi vica), *ĝermigi, krucigi* (igi kruca).

d) *apartena al...*; ekzemple: *ŝtatigi, sociigi*.

Tiuj ĉi pluraj senceoj same ne estigas konfuzon, kiel ĉe la adjektivaj formoj (reĝa persono, reĝa konduto, reĝa palaco). La sola escepto ekzistas ĉe adjektiv-radikaj substantivoj. Nome, ili en adjektiva formo neniam signifas "*kiu estas -o*", sed ĉiam "*kiu estas -a*". Do *varmigi, acidigi* signifas *igi varma, acida*; mankas vorto por *igi varmo, acido*. En tiuj ĉi okazoj (cetere tre malmultaj), oni povas konservi la finaĵon (varmoigi, acidoigi), aŭ uzi la sufikson *ifi* (varmifi, acidifi) (vd. §§ 414, 435).

Ĉe multaj substantivradikaj igi-kunmetoj oni iom post iom forlasas tute la sufikson, ĉar la senpere derivita verbo havas la saman senceon; ekzemple: *ordi* (ordigi); *normi* (normigi); *klasi* (klasigi); *limi* (limigi); *animi* (animigi); *loki* (lokigi); *ombri* (ombrigi); *kruci* (krucigi); *trui* (truigi) ktp.

2. Post **a d j e k t i v a j** radikoj la adjektiveco restas. Ekzemple: *certigi* (igi certa), *sekigi, blindigi, beligi, plibonigi, identigi, feliĉigi, kurbigi, trankviligi, blankigi, nigriĝi, paligi, diferencigi, kontentigi, rektigi, plilongigi, kulpigi* (propre: igi kulpa), *necesigi, varmigi, lacigi, pravigi, rapidigi*.

3. Post **v e r b a j** radikoj validas same VER. III. Do la verba flankelemento adjektiviga. Sed aliflanke, la latentaj a-finaĵoj postulas antaŭan substantivon, do la adjektivigo pasas tra substantivigo. La analizo do estas: *iRo-a-igi*. Ekzemple: *veniĝi*: veno-a-igi; *igi karakterizata de veno*.

Sed, kiel ni vidis (§ 296, B. 2. c.), la verbosubstantivoj unuigas en si same la aktivan, kiel la pasivan senceon. Kaj, ĉar la adjektivigo de verbaj radikoj pasas ĉiam tra substantivigo, la samo validas ankaŭ pri la verboadjektivoj. Tio pravigas la formojn: *ĉagrena koro* (koro karakterizata de

[onia] ĉagreno), *konfuza* konduto (konduto karakterizata de [onia] konfuzo); tie ĉi *ĉagrena* kaj *konfuza* signifas *ĉagrenita* kaj *konfuzita*, dum en *ĉagrena* okazaĵo kaj *konfuza* surprizo ili signifas *ĉagrenanta* kaj *konfuzanta*.

Tiun ĉi eblon de hibrideco, kiu ĉe la a-finaĵa formo estas uzata nur en kelkaj malmultaj okazoj (*abstrakta*, *korekta* ktp.), la lingvouzo plene fruktuzas en la igi-kunmetoj, eliziante helpe de ĝi la participajn elementojn, kiuj tropezigus la vortojn. La vorto *manĝigi* do signifas *igi manĝa* (*manĝanta* aŭ *manĝata*).

La lingvouzo fiksas la sencon de tiaj igi-kunmetoj tiamaniere, ke ĉe unuj verboj ili signifas ĉiam *igi -anta*, ĉe aliaj verboj ĉiam *igi -ata*, aŭ *igi -ita*.

Grupigante la verbojn laŭ la klasoj faritaj ĉe la aĵo-kunmetoj (vd. § 328, 2. a-f), ni povas starigi jenajn regulojn:

a) Ĉe produkt-verboj (kaj ĉe ilia malo), alternsubjektaj verboj kaj rilatverboj la igi-kunmetoj signifas ĉiam *igi -ata* aŭ *igi -ita*. Ekzemple: *konstruigi* (igi konstruita), *detruigi* (domon), *bakigi* (panon), *kuirigi* (kafon), *bindigi* (libron), *draŝigi* (pajlon), *fosigi* (tranĉeon), *pentrigi* (bildon), *skribigi* (leteron), *barigi* (korton); *amuzigi* (igi amuzata iun per iu alia), *armigi* (igi armita per iu alia), *ilustrigi*, *komencigi*, *kompensigi*, *ornamigi*, *provigi*, *pruvigi*, *ŝtopigi*, *ŝmirigi*, *vestigi* ktp.; *akirigi* (ion per iu alia), *bezoni*, *gajni*, *havigi*, *heredigi*, *perdi* ktp. (ion al iu alia).*

Rim. I. Propre la supraj formoj estas dusencaj. *Igi libron ilustrita* ekzemple povas signifi, ke iu ĝin igas ilustrita *mem* kaj ke iu ĝin igas ilustrita *per iu alia*. Sed ĉar por la unua signifo ekzistas la simpla formo *ilustri*, la *igi-kunmeto* estas uzata ĉiam en la dua senco.

b) ĉe verboj esprimantaj *stato*n, *procezo*n, la igi-kunmetoj kompreneble povas signifi nur *igi -anta*, aŭ *igi -inta*. Ekzemple: *apartenigi* (igi apartenanta), *boligi* (igi bolanta), *bruligi*, *sidigi*, *starigi*, *ŝaligi*, *estigi*, *eksplozigi*, *mortigi*, *vivigi*, *okazigi*, *putrigi*, *rampigi*, *ŝveligi*, *valorigi*, *ĉesigi*, *daŭrigi*, *dormigi*, *enuigi*, *kuŝigi*, *kutimigi*, *pasigi*, *pendigi*, *pereigi*, *suferigi*, *ŝpruci*, *veni* ktp. Oni povas ĉe tiuj verboj rilatigi la agon al la subjekto *mem* per la refleksiva pronomo (*mortigi sin*, *pendigi sin*, *pereigi sin*, *suferigi sin*).

c) ĉe la *agaplikaj* verboj ambaŭ sencoj estas eblaj. Ekzemple: *abomenigi* (ion al iu kaj iun pri io), *studigi*, *lernigi*, *devigi*, *abortigi*

* Oni renkontas ne malofte la formojn *konvinkigi*, *finigi*, *konfuzigi*, *vekigi*, *komencigi* en la senco *konvinki*, *fini*, *konfuzi*, *veki*, *komenci*. Teorie tiuj formoj ja estus pravigeblaj, ĉar ekzemple *finigi* signifas *igi fina*, do samsignifa al *fini*. Sed, kiel ni vidis, tiujn malsimplajn formojn la lingvouzo rezervis por la senco: *farigi per iu alia*, do uzi ilin en la simpla senco estas malĝuste. *Finigi* do signifas: *fari, ke iu alia finu*.

(iun kaj ion), *mangigi* (iun kaj ion), *trinkigi* (iun kaj ion). Esceptoj: *legigi*, *vidigi*, *glutigi* (nur *igi -ata*); *laborigi*, *mirigi*, *admirigi* (nur *igi -anta*).

d) ĉe verboj de spirita funkcio same ekzistas ambaŭ eblaĵoj. Ekzemple: *sciigi* (iun pri io kaj ion al iu), *konigi*, *pensigi* (ion al iu kaj iun pri io). Nur la aktiva senco estas valida ĉe *atentigi iun pri^z*; *kompatigi iun al iu^z*; *kredigi iun, ke^z*.

La signifo de *igi* do ĉe verbaj radikoj respondas al la *faktivita voĉo* (Vd. la difinon sub § 97; la formojn sub § 103; la uzadon sub § 119, C).

P l u f o r m a n t e per *igi* substantivradikajn verbojn (kroni, brosi, marteli) oni devus iel marki la verban elementon elfalantan dum la pluformado. Ekzemple: *marteligi* estas *igi martela*, dum oni devus diri: *igi marteli*. La normala formo estus do, kun la anstataŭigo de la i-finaĵo per *-ad-*: *marteladigi*.

Tamen, ĉe substantivo-verboj signifantaj *agi per* oni povas ellasi la i-finaĵon. Nome, la substantiva flankelemento ĉi-okaze ĉiam signas ilon, objekton, kiu servas por ago farata *per* ĝi. En verbaj kunmetoj (ekz-e *marteli*, *marteligi*) do la sola ebla analizo okazas senc-logike per *per* (*per martelo*), aŭ, kio estas la sama, per adverbo (*martele*). La strukturo de *marteligi* do estas: *martele-igi*.

Sed *martele* (adverbo) ne povas rilati al *igi*, ĉar tiu ĉi postulas antaŭan adjektivon (*a-igi*). Do ĝi, per inversa vortefiko, estigas post si latentan agan elementon (i-finaĵon), por povi al ĝi rilati adverbe. La strukturo do estas: (martele→i)-o←a←igi.

Do en la strukturo de *marteligi* per inversa senc-efiko apudas meze la finaĵo *i-o-a*, sekve la vorto fariĝas tia sama verbo-adjektivo kiel *scia* (sci-o-a).

Same estas ĉe *vipigi*, *trumpetigi*, *tamburigi*, *butonigi*, *skurgigi*, *brosigi* ktp.

Pli simple: *marteligi*, ĉar ĝi neniam estas bezonata en la senco *igi martela*, povas esti uzata en la senco: *igi marteli*. La samo validas pri ĉiuj substantivaj kaj adjektivaj radikoj, kies senpera i-finaĵa pluformado estas uzbla: ĉe ili *igi* povas esti analizata kiel faktitiva sufiksoido postulanta antaŭ si agan elementon: *kronigi*, *vestigi*, *venenigi*, *najligi*, *reĝigi*, *edzigi*, *gastigi*, *vaporigi*, *flamigi*, *pacigi*, *utiligi*, *rapidigi* do estas analizeblaj kiel *igi kroni*, *veneni*, *reĝi*, *gasti*, *paci*, *utili*, *rapidi* ktp. Kompreneble, ĉe substantivoj, kiuj ne estas uzataj kun i-finaĵa pluformado, validas la predikat-adjektiva analizo: *ŝtatigi*, *sociigi*, *buterigi*, *ŝtaligi* do restas: *igi ŝtata*, *socia*, *butera*, *ŝtala*.

Praktike, tiu dumaniera analizo de la *igi*-kunmetoj apenaŭ estigas konfuzon en la ĉiutaga lingvo; eventualan dusencecon forigas la kunteksto: *ŝtonigi vojon per laboristo* (*igi ŝtoni*); *ŝtonigi iun per teruro* (*igi ŝtona*). Sed en la teknika lingvo, kie pli granda precizo estas bezonata, oni devas serĉi rimedon de distingo, do trovi la eblon signi la agan elementon antaŭ *-igi*. Tiaj eblaĵoj estas kvar:

- a) uzi la sufikson **-um**, kiu en la fruaj tempoj ja estis regule uzata anstataŭ la senpera finaĵa verbigo (vd. § 413, Rim. I.). Oni do dirus, ekz-e *venenumigi* (t.e. igi veneni per iu alia);
- b) uzi la sufiksoidon **-ad-**; tio taŭgas precipe ĉe daŭraj aŭ ripetataj agoj: *marteladigi* feron;
- c) uzi la participajn finaĵojn; tiamaniere oni povas distingi eĉ inter aktiva kaj pasiva ago: *venenatigi* kaj *venenantigi*; *manĝatigi* kaj *manĝantigi* (Zamenhofaj formoj). Tiaokaze oni povus uzi ĝenerale la prezencajn formojn de la participo, ĉar ja temas pri la plenumigo de ia ago, la rezulto ne concernas strikte la vorton, kaj ĝia esprimo necesas nur esceptokaze;
- d) en la teknika lingvo uzi la sufiksoidon **-izi** (vd. § 360), kaj ĝin pluformi per **-igi**: *najlizi*-*najlizigi*. La izi-kunmeto tamen ne samsencas kun la senpera verbigo de la primitiva radiko, kaj tial, se temas pri *najli* anstataŭ *najlizi*, oni devas diri en la pluformado: *najlumigi* aŭ *najladigi*. (Vd. ankaŭ § 434).

4. Post **adverbaj radikoj kaj prepozicioj** validiĝas la adjektiviga efiko de *igi*. Ekzemple: *neprigi* (igi nepra), *tujigi* (igi tuja), *anstataŭigi* (igi anstataŭa), *antaŭigi* (igi antaŭa), *aligi* (igi ala), *ĉirkaŭigi* (igi troa). Same post **prefiksoj**: *disigi* (igi disa), *eksigi* (igi eksa), *geigi* (igi gea); *eksedzigi*.

5. Sufikskunmetoj: *indigi*, *eblig*, *emigi*, *endigi*, *estrigi*, *arigi*.

6. **Numeraloj**: *unuigi* (igi unu), *(dis)duigi*, *duonigi*, *triobligi*, *duopigi*.

7. **Igi** povas havi ankaŭ **duoblajn flankelementojn**. Ĝi ĉiam adjektivigas ilin kiel tuton. Ekzemploj: *enpoŝigi* (igi enpoŝa), *altabligi*, *surtabligi*, *enlitigi*, *ellitigi*, *devoĝigi* (igi devoja), *enkorpig*, *enŝipigi*, *enterigi*, *subakvig*, *senakvig* (igi senakva), *senmaskigi*, *senplumigi*, *senhaŭtigi*, *senfeligi*, *senvualigi*, *senmovigi* (igi senmova), *sensentigi*, *senfortigi* (igi senforta), *senesperigi*, *sendevigi* (igi sendeva), *senkuraĝigi* (igi senkuraĝa), *bonvenigi* (igi bonvena). La analizon de tiuj flankelementoj vd. § 308.

Rim. II. Kelkfoje oni uzas tian kunmeton kun *sen* kaj *igi*, eĉ kiam ekzistas pli simpla vorto kun *mal*; certe ĉar la antaŭan formon oni sentas pli elvokiva. Ekzemple: *senvestigi* (malvesti), *senŝarĝigi* (malŝarĝi).

Rim. III. Kelkfoje oni ellasas antaŭ *igi* la sufikson de la verba flankelemento, lasante ĝian divenigon al la vortlogiko. Ekzemple: *enloĝigi* (enloĝeĝigi), *enveturigi* (enveturiligi), *senarmigi* (senarmiligi). Oni trovas eĉ formojn: *lumita*, *fumita*, *ĉesita*, en kiuj la vortefiko de la pasiva participfinajo atribuas al la netraktivita radiko sencon transitivan. Kp. § 119, B. Rim.

Rim. IV. Komprenoble la prepozicio povas rilati ne nur al la maldekstra flankelemento kiel en la supraj ekzemploj, sed ankaŭ prefikse al la tuta komplekso post si. Ekzemple: *dissekigi* (sekigi disa), *kunamasigi* (amasigi kuna). Ofte eblas ambaŭ analizmetodoj, ekzemple: *disfaligi* (faligi disa kaj igi disfala), *kunvenigi* (venigi kunaj kaj igi kunvenaj).

Kun la prefikso *dis-* oni kelkfoje tute forlasas *igi*; ekzemple: *diskarni*, *dispeceti*, *dismembri*.

Pluformado de igi-kunmeto. Ĉiu *igi-kunmeto* povas esti substantivigita, por signi la nomon de la respektiva ago. Tiu substantivigo rilatas ĉiam al la tuta kunmeto kiel al tuto. Ekzemple: *purigo*: (*purigi*)-o; *ŝtonigo*: (*ŝtonigi*)-o; *senarmigo*: (*senarmigi*)-o.

La *igo-kunmetojn* oni povas adjektivigi; tiel oni ricevas adjektivojn kun la proksimuma senco *-pova*; ekzemple: *puriga*: (*purigi*)-a; *ŝtoniga*: (*ŝtonigi*)-a, aŭ kun la senco *rilata, apartena al...*; ekzemple: *senarmiga konferenco* (konferenco de senarmigo).

Memstare: *igi* signifas: *fari -a, fari, ke io estu -a; fari, efiki, ke iu faru ion aŭ ke io estu farata* (infinitiva komplemento). Ekzemple: *igi pura, igi cedema, igi ŝtona; li igis fari al si veston; mi igis rakonti al mi la novaĵon*.

Rim. V. Inter *fari* kaj *igi* ekzistas tiu diferenco, ke *igi* neniam signifas *fari ion el io*, do *krei, produkti*. Sed ĉiam nur *fari ion ia*, aŭ *fari ion (iun) -anta*, aŭ *-ata*. Do oni ne povas diri *li igis veston*, sed nur: *li faris aŭ igis fari aŭ farigis veston*, aŭ: *li igis la veston malpura*.

IĜI

359

La signifo de *iĝi* estas *sin ŝanĝi -a, ekesti -a*.

Analizo: VER. III. 2. Do la flankelemento estas ĉiam predikata atributo *adjektiva*.

Iĝi povas ligiĝi al adjektivaj, substantivaj kaj verbaj radikoj, sed la neadjektivajn ĝi adjektivigas per sia vortefiko. Ĝi do estas tute analogaj al *igi*.

1. Post *substantivaj* radikoj ĝia analizo estas: *oRa-iĝi*. Ekzemple: *reĝiĝi*: *iĝi reĝa*.

La tiel estiĝintaj substantivo-adjektivoj povas havi ĉiujn sencojn signebajn per la a-finaĵo (vd. § 296).

a) *kiu estas -o*; ekzemple: *ruiniĝi*: *iĝi ruina (ruino)*; *gastiĝi*: *iĝi gasta (gasto)*; *edziĝi, edziniĝi, fianĉiniĝi, ringiĝi, tagiĝi*: *iĝi taga (tago)*; *mateniĝi, printempiĝi*.

b) *kiu estas el -o*; ekzemple: *ŝtoniĝi*: *iĝi ŝtona (el ŝtono)*; *buteriĝi, kazeiĝi, korpigiĝi, personiĝi, vaporiĝi, ŝtaliĝi, neniĝi*.

c) *karakterizata de -o; -o-kvalita aŭ -o-hava*; ekzemple: *pintiĝi* (*iĝi pinta*); *flamiĝi* (*iĝi flama*); *fruktiĝi* (*iĝi frukta*); *paciĝi, amasiĝi, naturiĝi, viciĝi* (*iĝi vica*), *kruciĝi* (*iĝi kruca*), *ordiĝi* (*iĝi orda*), *normiĝi, animiĝi* (*iĝi animhava*), *lokiĝi* (*iĝi loka*), *ombriĝi* (*iĝi ombra*), *truiĝi* (*iĝi trua*), *reguliĝi* (*iĝi regula*), *formiĝi* (*iĝi forma [formhava]*). Tamen, *teruriĝi* estas uzata ne en la senco *iĝi terura*, sed kiel *iĝi terurita* (hororiĝi). *Genuiĝi*² signifas: *iĝi (sur-)genua*; la senco de *frostiĝi* estas *iĝi frost(rigida)*.

d) *apartena al..., rilata al...*; ekzemple: *ŝtatiĝi* (*iĝi ŝtata*), *sociiĝi* (*iĝi socia*).

Rim. I. La pluraj sencoj de la latentaj a-finajo same ne estigas konfuzon kiel ĉe la adjektivaj formoj (reĝa persono, konduto, palaco). Nur ĉe la pluformado de adjektiv-radikaj substantivoj povas esti konfuzo: *varmiĝi*, *acidiĝi* signifas *iĝi varma*, *iĝi acida*; mankas vortoj por *iĝi varmo*, *iĝi acido*. En tiuj ĉi okazoj (cetere tre malmultaj), oni povas sin helpi per la konservo de la o-finajo (varmo*iĝi*, acido*iĝi*), eventuale per la teknika sufikso *ifĭ*: varmif*iĝi*, acidif*iĝi* (vd. §§ 414, 435).

2. Post **a d j e k t i v a j** radikoj la adjektiveco restas. Ekzemple: *certiĝi* (iĝi certa), *sekiĝi*, *blindiĝi*, *beliĝi*, *pliboniĝi*, *identiĝi*, *feliĉiĝi*, *kurbiĝi*, *trankviliĝi*, *blankiĝi*, *nigriĝi*, *paliĝi*, *diferenciĝi*, *kontentiĝi*, *rektiĝi*, *plilongiĝi*, *kulpiĝi* (iĝi kulpa), *necesiĝi*, *varmiĝi*, *laciĝi*, *praviĝi*, *rapidiĝi*.

Rim. II. Oni atentu pri tio, ke la *iĝi*-formoj supraj signifas: *veni en staton*, *sin ŝanĝi -a*, do ne: *esti en stato*, *esti -a*. Do oni ne uzu *ondiĝi* anstataŭ *ondi*, *gastiĝi* anstataŭ *gasti*, *mateniĝi* anstataŭ *mateni*, *printemp*iĝi** anstataŭ *printempi*; *pintiĝi*, *flamiĝi*, *amasiĝi*, *paciĝi*, *naturiĝi*, *viciĝi*, *vaporiĝi* ktp. anstataŭ *pinti*, *flami*, *amasi*, *paci*, *naturi*, *vici*, *vapori* ktp. Kiam la senpere derivita verbo signifas aktivan, transitivan agon, oni devas meti la *iĝi*-formon en *estintan* tempon por signi la *nunan* staton; ekzemple: la aferoj *ordiĝis*, la vojoj *kruĉiĝis* ktp. La samo rilatas ankaŭ al la adjektivradikaj kunmetoj. "La nokto nigriĝas" – signifas, ke la nokto iom post iom iĝas nigra. Por diri, ke la nokto estas nigra, impresas nigre, oni devas diri: "La nokto nigras". Same: la arboj *verdiĝas* (iĝas verdaj) kaj *verdas* (estas verdaj); mi *certas* (estas certa) pri tio; li *palas*, *feliĉas*, *kontentas*, *kulpas*, *lacas*, *pacas*, *pravas*; tio *diferencas*, *identas*, *rapidas*, *utilas*, *necesas*. – La sola escepto estas *nomiĝi* (ne-Z-a), uzata ne en la senco *iĝi noma*, sed en la senco *esti noma* (nomhava). Tie ĉi necesus la formo: *nomati*.

3. Post **v e r b a j** radikoj validas same VER. III. 2. Do la verba flank-elemento adjektivigas. Analizo: *iRo-a-iĝi*.

Kiel ni jam plurfoje vidis, la verboadjektivoj povas teorie unuigi en si same la aktivan kiel la pasivan sencon, ĉar la verbosubstantivo, al kiu vortefike la a-finajo gluiĝas, estas kvazaŭ neŭtrala kampo por ambaŭ sencoj. Ĉe la a-finajaj formoj tiu eblo de hibrideco estas nur malofte uzata (konfuza, ĉagrena, ekscita, incita, embarasa, abstrakta, korekta), sed ĉe la pluformado per *iĝi* (kaj *iĝi*) la lingvo plene fruktuzas ĝin por elimini la pezajn partcipajn elementojn (kiuj estas propre nur pliprecizigoj de la a-finajaj formoj).

La vorto *sciĝi* do signifas *iĝi scianta* kaj *iĝi sciata*.

Sed, ĉar tiu dusenceco ofte estigus konfuzon, la senco *iĝi -anta* estas uzata preskaŭ nur ĉe la netransitivaj *stat-* aŭ *procez-*verboj. Ĉiam la senco *iĝi -ata* estas uzata ĉe la produktverboj, dudirektaj verboj, rilatverboj, agaplikaj verboj (vd. ajo, § 328, 2.). Nur ĉe *sci* kaj *decidi* oni uzas aktivsence la *iĝi*-formon: *sciĝi* (ekscii), *decidiĝi* (ekdecidi).

Ekzemploj:

a) Senco: *iĝi -anta*: *stariĝi*: iĝi star(ant)a; *sidiĝi*: iĝi sid(ant)a; *estiĝi*: iĝi est(ant)a; *valoriĝi*: iĝi valor(ant)a; *boliĝi*: iĝi bol(ant)a. Kompreneble ĉe verboj signifantaj *momentan* agon, ĝi estas superflua. Oni do ne diru: *ĉesiĝi*, *eksplo*iĝi**, *faliĝi*, *mortiĝi* anstataŭ *ĉesi*, *eksplo*i**, *fali*, *morti*.

Ofte oni uzas prefere la prefikson *ek-*; ekzemple: *ekiri, ekbruli, ekboli, ekdegeli, ekputri*. Uziĝas ankaŭ la formoj *eksidi, ekstari, ekesti*, same sed ne pli bonaj ol la iĝi-formoj.

b) Senco: *iĝi -ata*; *konstruiĝi* (iĝi konstruata); *fariĝi, skribiĝi, desegniĝi, gravuriĝi, fandiĝi, fosiĝi, bariĝi, finiĝi, gluiĝi, garniĝi, komenciĝi, kompensiĝi, nutriĝi, okupiĝi, pruviĝi, ŝtopiĝi, ŝmiriĝi, vestiĝi, vindiĝi, volviĝi, formiĝi, turniĝi, vekigi, ŝiriĝi, rompiĝi, sufokiĝi, ruliĝi, leviĝi, informiĝi, interesiĝi, akceptiĝi, trompiĝi, haviĝi, herediĝi, perdiĝi, glutigi, legiĝi, trinkiĝi, aŭdiĝi, vidiĝi, pensiĝi*. Ĉe tiuj verboj, por signi *iĝi -anta*, oni uzas ĉiam la prefikson *ek-*; ekzemple: *ekkonstrui, ekskribi, ekturni, ekŝiri, ekvolvi, ekbruli, eklegi, ektrinki, ekaŭdi, ekpensi* ktp.

Sed oni devas bone atenti! La supraj analizoj sub b. donas nur la vortfaran strukturon de tiuj vortoj, kiu ne respondas al ilia efektiva signifo. La strukturo estas *iĝi -ata*, dum la signifo, laŭ kiu ili uziĝas, estas *esti -ata*, sed sen subkomprenigo de ekstera aganto (*mediala voĉo*; vd. difinon sub § 97; formojn sub § 104; uzadon sub § 119, D.).

Oni klopodis tion pravigi tiel, ke la pasiva ekago (kiun ja esprimas laŭstrukture tiuj formoj), ĉiam denove reripetiĝas: *la ŝtono ruliĝas = la ŝtono iĝas ĉiumomente ree ekrulata*. Fruictier eĉ diras necesa ĉe tiuj formoj la daŭran aspekton (kun *ad*), por montri tiun ripetigon: *la ŝtono ruliĝadas*. Tamen, oni apenaŭ uzas tiajn pezajn formojn kaj kontentas pri la simpla *iĝi*-formo. Sed per tio, oni propre donas novan signifon al *iĝi*, farante ĝin simple *medial-sufikso*, aŭ, alinome, netransitiviga sufikso de transitivaj verboj (vd. § 104).

La evoluon de tiu ĉi lingvo-kutimo oni povas klarigi tiel, ke ĉe verboj signifantaj momentan agon la diferenco inter *esti -ata* kaj *iĝi -ata* forviŝiĝas: *esti komencata* kaj *iĝi komencata* diras ja la samon. Oni do ekuzis la *iĝi*-formojn ĉe la moment-verboj anstataŭ la pli peza pasivo, kaj poste, per analogio, ties uzo transglitis ankaŭ al la daŭr-verboj: *ruliĝi, konstruiĝi* ktp.

Pluformante substantivradikajn verbojn per *iĝi*, oni devus iel signi la agan elementon elfalantan dum la pluformado. Tiaj formoj estas tre maloftaj. Pri *nomiĝi* ni jam parolis. Ĉe aliaj okazoj (*formiĝi, kroniĝi, vestiĝi, marteliĝi* ktp.) la senca logiko postulas la agan elementon antaŭ *iĝi* (vd. § 358, punkto 3. ĉefine).

4. Post **adverboj** kaj **prepozicioj** validiĝas la adjektiviga efiko de *iĝi*. Ekzemple: *nepriĝi* (iĝi nepra), *tujiĝi* (iĝi tuja), *aliĝi* (iĝi ala), *eliĝi, eniĝi, kuniĝi, seniĝi* (iĝi sena), *subiĝi, transiĝi*. Same post **prefiksoj**: *disiĝi* (iĝi disa), *eksiĝi, geiĝi*.

5. **Sufiksoidkunmetoj**: *indiĝi, ebliĝi, emiĝi, estriĝi, ariĝi*.

6. **Numeraloj**: *unuiĝi* (iĝi unu), *duiĝi, duoniĝi, duobliĝi, triopiĝi*.

7. **Iĝi** povas havi ankaŭ **duoblajn flankelementojn**, kiujn ĝi adjektivigas kiel tuton. Ekzemple: *altabliĝi* (iĝi altabla), *enlitigi, ellitigi, devojiĝi* (iĝi devoja), *enkorpiĝi, enŝipiĝi, subakviĝi, senakviĝi, senmaskiĝi* (iĝi senmaska), *senplumiĝi, senhaŭtiĝi, senvualiĝi, senmoviĝi*

(iĝi senmova), *sensentiĝi*, *senfortiĝi* (iĝi senforta), *senkuraĝiĝi* (iĝi senkuraĝa), *senesperigi*, *sendeviĝi* (iĝi sendeva), *eksedziĝi* (iĝi eksedza), *eksedziniĝi*.

Diskarniĝi: (disa karno)-a-iĝi: iĝi karakterizata de disa karno; *dispecetiĝi*, *dismembriĝi*.

Rim. III. Kelkfoje oni preferas *sen* kun *iĝi* al la pli simpla *mal*-kunmeto, pro la pli granda elvokiveco. Ekzemple: *senvestiĝi* (sin malvesti), *senarmiĝi* (sin malarmi), *senŝarĝiĝi* (sin malŝarĝi).

Rim. IV. Kelkfoje oni ellasas la sufikson de la verba flankelemento, lasante ĝian divenigon al la vortlogiko. Ekzemple: *enloĝiĝi* (enloĝejiĝi), *senarmiĝi* (senarmiliĝi), *enveturiĝi* (enveturiliĝi).

Rim. V. Kompreneble la prefiksoide uzata prepozicio povas rilati ne nur al la dekstra flankelemento, kiel en la supraj ekzemploj, sed ankaŭ al la tuta komplekso post si. Ekzemple: *k u n a m a s i ĝ i* (amasigi kuna), *dissekiĝi* (sekiĝi disa).

Pluformado de iĝi-kunmetoj. Ĉiujn oni povas substantivigi, por signi la nomon de la respektiva ago. Tiu substantivigo rilatas ĉiam al la tuta komplekso kiel al tuto: *purigo*: (purigi)-o; *ŝtonigo*: (ŝtonigi)-o; *senkuraĝigo*: (senkuraĝigi)-o.

La iĝo-kunmetojn oni povas pluformi per la a-finaĵo: *disiĝa*: (disiĝo)-a; *enkorpiĝa*: (enkorpiĝo)-a. Same eblas adverbaj formoj: *disiĝe*: (disiĝo)-e. Tiuj formoj estas malofte uzataj; oni aŭ reiras al la simpla -a-finaĵa (-e-finaĵa)formo: *malfrue* (malfruiĝe) veni; *komence* (komenciĝe), *distre* (distriĝe) paroli; *decide* (decidiĝe) agi; aŭ oni uzas pasivan participon (distrite, ekscitite, ĉagrenite).

M e m s t a r e: *iĝi* signifas: *ekesti*. *Iĝi verda*, *bona*, *ŝtona*, *terurita*, *sensenta* ktp. Ofte estas uzata ĉi-sence *fariĝi*. La nuancdiferenco inter ili estas neglektebla. Lastatempe oni pli kaj pli uzas *iĝi* en ĉiu okazo.

Rim. V. *Iĝi* neniam signifas *kreiĝi*. Oni ne diras ekzemple: *iĝis bruo*, *iĝis silento*. Ĉi-sence oni uzas *estiĝi*, aŭ, malpli ofte, *ekesti*.

IZI

Izi, teknika sufiksoido, estas uzata laŭ jenaj sencoj:

1. a p l i k i *ion* (agi per), *science aŭ metie*, sur alian objekton. Ekzemple: *najlizi* (provizi per najloj, do ne simple najli); *kronizi* (provizi per krono aŭ kronoj, ekz-e brodaĵon; do ne: *kroni*, ekz-e reĝon); *salizi* (saturi per salo fluidaĵon, ekzemple por precipiti koloidojn); *ŝtonizi* (vojon); *ŝtalizi*; *kuprizi*; *plumizi* (sagon); *butonizi* (veston); *paĝizi* (kompostajon).

2. a p l i k i *metodon* de iu (agi laŭ). Ekzemple: *pasteŭrizi*, *galvanizi*, *makadamizi*, *faradizi*, *rentgenizi*.

360

V. KVAZAŬSUFIKSOIDOJ

Ni diras, ke inter sufiksoidoj kaj radikoj ne ekzistas esenca diferenco. Sufiksoidoj povas esti uzataj radike (ilo, ino, ujo) kaj preskaŭ tute perdi

361

sian sufiksoidan karakteron (edzo). Aliflanke, radikoj povas, pro tre ofta uzateco en vortkunmetoj, ŝajni preskaŭ sufiksoidoj. Oni povus nomi ilin *kvazaŭsufiksoidoj*.

Tiaj estas ekzemple:

-*ama*: bestama, voluptama, gastama, verama;

-*hava*: barbhava, fendohava, flugilhava, ĝibhava, mankhava;

-*plena*: amplena, orplena, sentplena, larmoplenta;

-*pova*: scipova, esprimpova, agpova, irpova;

-*riĉa*: herbriĉa, sentriĉa, orriĉa, karbriĉa;

-*ŝajna*, *aspekta*, *-simila*, *-maniera*: verŝajna, trompŝajna; infanaspekta, reĝaspekta; florsimila, di-simila; bestmaniera, virmaniera.

Por kelkaj el tiaj kvazaŭsufiksoidoj, ĉar ili, pro la formo aŭ pro la longeco, ne ĉiam estas oportunaj, oni uzas aŭ proponis ankaŭ efektivajn sufiksoidojn: *iva* (pova), *oza* (plena, riĉa), *eska* (maniera, simila), kaj *oida* (forma).

VI. PSEŬDOSUFIKSOIDOJ

362

Kelkaj elementoj tiel ofte ripetigaŭs ĉe fino de vortoj, ke ili ŝajnas sufiksoidoj. Ili tamen ne estas sufiksoidoj veraj, ĉar la elemento troviĝanta antaŭ ili ne estas E-a vorto. Povas tamen okazi, ke oni, pro analogio, metas antaŭ ilin E-an elementon, tiel ke oni kreas el ili kvazaŭ sufiksoidon novan.

Ekzemple: la elemento **logio** estas pseŭdosufiksoido en la vortoj *antropologio*, *ornitologio*, *zoologio* ktp. Sed, ĉar ekzistas la vortoj *psikologio*, *sociologio*, *metodologio*, en kiuj **ologio** ŝajnas sufikso post la radikoj *psik*, *soci*, *metod*, oni formis ankaŭ la vorton *esperantologio*, kaj eble oni formas: *birdologio* (ornitologio), *formologio* (morfologio), *dentologio* (odontologio).

Same: la vorto *ideografio* (ideo-priskribo) povus konduki al la vortoj: *librografio*, *vivografio*, *historiografio*.

Same: *poetiko*, *stilistiko* ŝajnas devenigitaj el *poeto*, *stilisto* per sufikso **ik**. Pro tiu analogio Neergaard proponis la vortojn *ĵurnaliko*, *ĝardeniko*.

Pli bonaj estus, laŭ nia opinio, la formoj: *ĵurnalistiko*, *ĝardenistiko*, *dancistiko*, laŭ la analogio de *stilisto-stilistiko* kaj *beletristo-beletristiko*.

Same: en *groteska* (grotmaniera), *arabesko* (arabmanieraĵo), *fosforeski*, *fluoreski* la elemento **esk** ŝajnas gluita al la E-aj vortoj *groto*, *arabo*, *fosforo*, *fluoro*. Laŭ analogio do oni povas proponi: *fraŭleska*, *vireska*, *japaneska*, *fereska* ktp. (vd. *eska*; § 353).

Same: ĉar *normala*, *formala* signifas *apartena al normo*, *formo*, oni povus uzi **al** ĉi-sence ĉe adjektivaj radikoj por formi ekz-e: *acidala* (vd. § 352). Sentis proponis ĝin eĉ por la senco 3. de *ema* (vd. § 349), t.e. esprimi la (iom paradoksan) *malgraŭvolan* emon: *mortala*, *erarala*, *kulpala*, ĉar oni ja povas diri, ke ĉi tie temas pri laŭkarakteraj ligiteco, aparteneco; sed tio restas nur propono.

Pseŭdosufiksoidoj estas **-cio**, **-acio**, **-icio**, kiuj havas proksimume la senco de **-ado**. (Kompreneble ne en *glacio*, *gracio*, *patricio* kaj similaj). La ĝenerala tendenco estas anstataŭigi ilin per **-ado**, kaj precipe, en la verba formo, per **-i**. Tiel pli kaj pli oni renkontas, parte oni eĉ oficialigis la formojn: *abnegi* (abnegacii), *navigi* (navigacii), *konjugi* (-acii), *riveli* (revelacii), *deklaraĵo* (-acio), *federi* (-acii), *dekori* (-acii), *civilizo* (-acio), *erudita* (erudicia), *oponi* (opozicii), *erupti* (erupcii), *evolui* (-cii), *spekuli* (-acii), *inaŭguri* (-acii), *diserti* (-acii), *deklini* (-acii), *negi* (-acii), *apeli* (-acii) ktp. Tamen tio ne ĉiam estas ebla. En kelkaj okazoj la *cio*-formo havas alian signifon ol la vorto senpere derivita el la radiko: *irigacii* (ne: irigi), *obligacio* (ne: obl-igo), *reformacio* (en religio-historia senco), *rezignacii* (ne: rezigni, sed malgraŭplaĉe kontentiĝi pri io), *generacio* (ne: genero), *operacio* (ne: opero), *arbitracii* (ne: arbitra), *sensacio* (ne: senso), *manifestacio* (ne: manifesto), *sekrecio* (ne: sekreto), *pozicio* (ne: pozo), *projekcii* (ne: projekti), *sekcio* (ne: sekto) ktp. En kelkaj okazoj la *cio*-formo estas pli oportuna pro sia pli vasta signifo, esprimanta kune la lokon, la agadon, la agantaron: *delegacio*, *redakcio*, *direkcio*; aŭ por signi teknikan terminon: *komparacio*, *negacio*.

Eble kiel pseŭdosufiksoidojn oni povus rigardi ankoraŭ: **at**, **itat**: *universitato*, *formato*, *kantato*; **ent**: *agente*, *dirigente*, *komponento*, *prezidento*, *regente*, *studento* *; **iv**: *nominativo*, *indikativo*, *defensivo*, *ofensivo*, *efektiva* ktp. kaj fine **or** kaj **ator**: *iniciatoro* (iniciatinto), *uzurpatoro* (uzurpanto), *transformatoro* (transformilo), *generatoro* (generilo), *akumulatoro*, *kondensatoro*, *inspektoro*, *direktoro*, *kreditoro*, *spektatoro* (spektanto), ks. Migliorini eĉ proponis fari el **or** sufiksoidon kun la senco: *maŝino*, kaj uzi antaŭ ĝi **ad** por havi internaciajn formojn: *akumuladoro*, *generadoro*, *transformadoro* ktp. Tio havus la avantaĝon, ke tiamaniere tiuj vortoj apartenus al la pure Esp-a lingvostoko.

El la vidpunkto de la komuna lingvuzo oni povas rigardi pseŭdosufiksojn ankaŭ la ĥemiajn: **at**, **hidr**, **id**, **il**, **it** kaj la botanikajn: **ac**, **al**. Iliajn signifon vd. en la Plena Ilustrita Vortaro.

* Ni citu ĉi-okaze la atentigon de D-ro Albault, Direktoro de la Akademia Sekcio pri la ĝenerala vortaro, ke etimologie la finaĵo **-ent** montras al konkretaĵoj kaj la finaĵo **-enc** (el la latina **-entia**) al abstraktaĵoj: *tendenco*, *diferenco*, *pacienco* ktp. Tial la formojn *ingredienco* kaj *precedenco* Zamenhof tiris bedaŭrinde el la germana, dum la rusa proponis al li la ĝustajn, kaj uzendajn: *ingrediente* kaj *precedente*. (G.W.)

B. PREFIKSOIDOJ

Difino

363 Prefiksoidoj oni nomas elementojn, gluitajn antaŭ verbajn radikojn. De la veraj prefiksoj ilin distingas, ke ili sekvas la regulojn de la vortefiko (VER.). Fakte, laŭ sia vortkonstrua funkcio, ili neniel diferencas de la radikoj veraj. Ekzemple: *mortpafi* kaj *dispafi* postulas tute saman analizon kun predikativo; *pafi morta* (pafi ion, tiel ke ĝi iĝas morta) kaj *pafi disa* (pafi ion, tiel ke ĝi iĝas disa). Same: *rapidiri* (iri rapide) kaj *ekiri* (iri eke).

Rim. I. Inter radikoj kaj prefiksoidoj tamen oni povus fari tiun distingon, ke radikoj nur esceptokaze estas ligitaj antaŭ verbon kun adverba funkcio, plejofte ili formas memstaran vorton kun la e-finaĵo (bone farti, diligente lerni). Male, kelkaj prefiksoidoj servas ĝuste por tia tasko.

Prefiksoidoj estas: **dis, ek, for, mis, re** kaj la neoficiala **retro**.

Divido

364 1. Kiel oni supre vidis, la prefiksoidoj povas havi diversajn funkciojn laŭ sia rilato al la posta verbradiko. Laŭ tiu funkcio oni povas ilin dividi jene:

a) La prefiksoido funkcias kiel adverba adjekto de verbo (*miskonduti*: konduti mise; *ekiri*: iri eke).

b) La prefiksoido funkcias kiel predikat-adjektivo de verbo (*disiri*: iri disaj; *forsendi*: sendi fora). Vd. § 297.

c) La prefiksoido estas maldekstra flankelemento en flankelement-duoblo (*diskarnigi*: igi disa karno). Tiaokaze, propre, ĝi jam funkcias ne prefiksoido, sed simple *radike*.

Rim. II. La prefiksoidojn propre oni devas klasi inter la primitivajn adverbojn. Tial ni nomos ilin *prefiksoidoj adverbaj*. Tamen, el ili nur unu (*for*) estas uzata memstare sen finaĵo; la aliaj (*ek, dis, mis, re*) alprenas finaĵon ĉe memstara uzo. Tia uzo estas, tamen, nur afero de kutimo, sed tute ne gramatika postulo. Oni tute bone povus uzi memstare ankaŭ *ek, dis, re, retro*, dum *mis* estas propre adjektiva radiko (*erara, malbona, malĝusta*); kiel tia, ĝi estas finaĵbezona (*misa*).

2. Ankaŭ radikoj kaj prepozicioj povas funkcii tiel, ke ili ŝajnas prefiksoidoj. Tiujn ni nomu *radikaj prefiksoidoj* kaj *prepoziciaj prefiksoidoj*.

a) La plej ofte uzataj *prefiksoidoj radikaj* estas **vir** kaj **ĉef**. Ili ligiĝas laŭ VER. I. E. (vd. § 291): *virŝafo*: viro ŝafo: ŝafo, kiu estas viro; *ĉef-*

ministro: ĉefo ministro: ministro, kiu estas ĉefo (inter la ceteraj ministroj).

b) Ciuj *prepozicioj* povas funkcii prefiksoide. Same kiel la veraj prefiksoidoj, ili povas esti *adverbaj adjektoj* (*kunludi*: ludi kune), *predikat-adjektivoj* (*kunveni*: veni kunaj) kaj *maldekstraj flankelementoj* de flankelement-duoblo (*enlitigi*: igi en-lita). Pri du kromaj funkcioj, vd. § 373, c. d.

Rim. III. Radikoj, prefiksoidoj, prepozicioj povas funkcii malofte ankaŭ kiel *veraj prefiksoj*. Tion ni nomas prefiksiĝo de radiko, prefiksoido, prepozicio. Vd. § 416 kaj sekva.

Malsupre ni pritraktos laŭ alfabeto ordo unue la adverbajn, poste la radikajn, fine la prepoziciajn prefiksoidojn.

I. ADVERBAJ PREFIKSOIDOJ

DIS

Dis havas la sencon "malkun". En siaj kunmetoj ĝi povas esti analizata:

a) *a d j e k t - a d v e r b e* (tre malofte): *disstari* (stari dise); *disbrili*, *disrigardi* (ĉirkaŭrigardi);

b) *p r e d i k a t - a d j e k t i v e*: (plej ofte): *disiri*: iri disaj; iri, tiel ke ili iĝas disaj; *disfeti* monon: ĵeti (monon, tiel ke ĝi iĝas) disa; *disŝiri*: ŝiri disa; *dispeli*: peli disaj; *dissendi*, *disbati*, *disbabili*, *disdoni*, *disporti*, *distrumpeti*, *disfrakasi*, *disrompi*, *disvolvi* (malvolvi), *disfaldi* (malfaldi), *disverŝi*, *disŝuti*, *disŝpruciĝi* (ŝpruciĝi disa), *disvastigi* (vastigi disa), *dispolviĝi* (polviĝi disa), *dispecigi* (pecigi disa), *diskurigi* (kurigi disa), *diserigi* (erigi disa); *disigi* (igi disa), *disigi* (igi disa); *disi*: (esti disa).

c) *m a l d e k s t r a f l a n k e l e m e n t o* en flankkomplekso: *diskarnigi*: (disa karno)-(a)-igi; *dismembrigi*. Oni povus uzi ankaŭ: *diskarni* (karni disa) kaj *dismembri* (membri disa).

M e m s t a r e: *disa*: malkuna; *diseco*: malkuneco; *diso*: malkuno (-aĵo aŭ -eco); *harmoniiĝi la disojn inter la anoj de la societo*.

Rim. I. Kelkfoje oni jam renkontis *dis* en kunmeto kun *de*: DISDE, por signi lokan malproksimiĝon: *depreno disde la kruco*; *infano forprenita disde la patrino*; aŭ metaforan: *distingi la patron disde la filo*. Tia uzo ŝajnas pli plaĉa ol la pli peza *for* en tiaj okazoj de neceso.

Rim. II. *Dis* estas tiom analoga al *for*, ke nenio motivas la malpermeson pri ĝia sammaniera memstara uzado: *la globetoj ruliĝis dis en la ĉambro*. Tio povas esti utila precipe en la poezio.

EK

Ek havas la sencon de *komenc* aŭ *subit*. En siaj kunmetoj ĝi estas analizata ĉiam adjektadverbe. Ĝi signas:

1. *k o m e n c o n* de ago; ekzemple: *ekiri* (komenci iri), *ekrapidi*, *eklabori*, *ekbatali*, *ekbruli*, *ekdormi*, *ekflori*, *ekkanti*, *ekkoleri*, *ekkoni*, *eklegi*, *eklerni*, *ekloĝi*, *ekparoli*, *ekpluvi*, *ekhavi*, *ekbruligi*, *ekkolerigi*.
2. *subitan momentan agon*; ekzemple: *ekbati*, *ekkrii*, *ekpafi*,

365

366

ekridi, ekkapti, ekrigardi, eksalti, ekskui, ekspiri, ekflami, ekpensi, eksoni, ekvidi, ekfulmi. Vd. ankoraŭ § 105-106.

Rim. I. Ek kiel ekskluzive antaŭverba prefiksoido havas inversan vortefikon verbigan. Tio, kvankam malofte, estas fruktuzata en tiaj formoj: *ekpluvo*: (ekpluvi)-o; *ekkvieto* (ekkvieti)-o; *ekflama*: (ekflami)-o-a; *ekmartelo*: (ekmarteli)-o.

Rim. II. Ĉe stat-verboj la ek-kunmeto signas pli rapidan, la iĝi-kunmeto pli trankvilan komencon de ago: *sidigi* (trankvile), *eksidi* (rapide); same *stariĝi* kaj *ekstari*; *estiĝi* kaj *ekesti*; *boliĝi* kaj *ekboli*. En la ek-kunmetoj ofte troviĝas nuanco de neatenditeco.

Ĉe transitivaj verboj netransitivigitaj per iĝi, la komencon aŭ subitecon oni signas same per ek: *ekvidigi, ekmovigi, ekturnigi*.

Por signi kelkfojan rekomencon de ago oni povas uzi ripeton de ek-verbo (ekrigardi kaj ekrigardi) aŭ la ripeton de ek: *ek kaj ekrigardi*.

Rim. III. Dum ek disponigas *unuacan* rimedon por signi la komencon de ago, por signi la ago-finon ni ne havas tian (vd. el, ĝis, tra kaj § 109).

Rim. IV. La memstara uzo de ek en *eki* (komenci) ne ekradikis. Ĝia senco, cetere, ŝajnas prefere *komenciĝi*: la pluvo ekis (ekpluvis).

Oni uzas ek ankaŭ kiel interjekcion: *faru vian devon, ek!*; *ek al la kongreso!* Kaj en kunmeto kun de (tempa): *ekde la kreo de la mondo* (ne skribu: *ek de*, kio donus al *ek* la valoron de interjekcio!).

FOR

367

For estas preskaŭ ekskluzive antaŭverba prefiksoido. En siaj kunmetoj ĝi estas analizata predikat-adjektive: *foriri*: iri fora: iri tiel, ke oni iĝas fora (iri foren).

Ĝi signifas:

1. pli - mal pli mal proksime (n): *foresti* (esti fora), *fori* (esti fora), *foriĝi* (iĝi fora), *forfali*, *forflui*, *forfluigi*, *foriri*, *forkuri*, *forresti* (resti fora), *forvagi*, *forveturi*, *fondoni* (doni fora), *fondonaci*, *forĵeti*, *forhaki*, *forkapti* (de antaŭ iu), *forklini*, *forlogi*, *formeti*, *forpeli*, *forperdi*, *forporti*, *forpreni*, *forpuŝi*, *forsavi*, *forsendi*, *forskui*, *forŝiri*, *forŝovi*, *forteni* (teni fora), *fortondi*, *forturni*, *forvendi*, *forverŝi*, *forverŝigi*; specialaj esprimoj: *forpermesi* (lasi fora, permesante), *forregali* (regali per forpelo), *forŝpiti* (forigi per spito), *fortimigi* (forigi per timigo).

Rim. I. En *forlasi* for rilatas al la subjekto (lasi sola forirante). Rilaton al la objekto oni esprimas per *delasi* (lasi foriri, foriĝi) aŭ per *ellasi* (lasi neuzata, nemenciata, nesignata). (Vd. § 381, R. II.).

Rim. II. *Forpafi* estas uzata em du sencoj: 1. forpafi el pafilo (kuglon); 2. forigi per la *bruo* de la pafilo (birdojn). Lastsence ĝi ŝajnas nekonsilinda, precipe ĉar *for* havas ankaŭ la senco de *neniigo* (kp. forbuĉi). Pli klara estas *fortimigi per pafilo*.

2: en malaperon, pereon, neniigo: *forigi* (makulon el vesto), *antaŭforigi* (malhelpi per antaŭa singardo), *forakrigi* (breĉojn el tranĉilo), *forargumenti* (neniigi intencon per argumentado), *forbeni* (kulpon), *forbuĉi* (gregon), *fordecidi* (neniigi intencon per kontraŭa

decido), *fordiboĉi* (havaĵon), *fordifekti* (fingron), *fordormi* (matenon, okazon), *fordrinki* (monon), *forlabori* (ĉagrenon; forgesi, laborante), *forleki* (saŭcon), *forludi* (monon), *formaĉi*, *formanĝi*, *formordi*, *forplori* (malĝojon), *forrazi*, *forrifuzi*, *foruzi* (neniigi, difekti per uzado).

Rim. III. For kiel antaŭverba prefiksoido atribuas agan elementon al la posta radiko: *forrapido*: (forrapidi)-o.

MIS

Mis- estis oficialigita de la Lingva Komitato en 1929, kun la sencoj: **er ar-**, **malĝust-**, **malbon-**. Ĝi do esprimas:

368

e k s t e r a n , f o r m a l a n nekonvenecon. Ekzemple: *miskalkuli* (erare kalkuli), *miskompreni* (erare kompreni), *misaĉeti* (nekonvene, malavantaĝe aĉeti), *misciti* (erare citi), *miskonkludi* (erare konkludi), *misgvidi* (malĝuste gvidi), *miskonduki*, *misdirekti*, *miskonjekti* (erare konjekti), *miskonstrui* (malĝuste, nekonvene konstrui), *miskopii* (malĝuste kopii), *miskorekti* (malĝuste korekti), *misformi* (malĝuste formi), *misdistingi* (erare distingi), *misesprimi* (erare, malĝuste esprimi), *mis-aŭdi* (erare aŭdi), *misvidi* (erare vidi), *mismastrumi* (malĝuste, erare mastrumi), *mislegi* (erare legi), *misinterpreti* (erare interpreti), *misfari* (erare fari), *mispentri* (malĝuste pentri), *misdesegni*, *mispledi* (malĝuste pledi), *misakuzi* (erare akuzi), *mispresi* (erare presi), *misproportia* (malĝustproportia), *misfiera* (erare, senkaŭze fiera), *misreformi* (fuŝi, reformante), *mistraduki* (fuŝi, tradukante), *misraporti* (erare raporti), *misdzigo* (subranga edziĝo), Vd. § 427.

Rim. I. Erare estas uzi *mis* anstataŭ *mal*. Oni do *ne* diru: *misatenti*, *misrespekti*, *miskontenta*, *misfidi*, *miskonvena* ktp.

Rim. II. Precipe en la poezio, oni komencas doni al *mis* ankaŭ iom alian signifon kaj uzi ĝin en la signifo **malbon**, eĉ kiam tiu ne signifas **er ar**, **malĝust**, sed internan, animan nekonvenecon, laŭ sia propra senco. Tia uzo estas komprenigebla per tio, ke tre mankas en E-o prefikso kun tia senco, krome ke *mis* en ĉiuj lingvoj, kie ĝi ekzistas, havas ankaŭ tiun signifon; al la angla *misdeed*, franca *méfait*, germana *Missetat*, do estas tute analoga la E-a *misfaro* (malbonfaro). Cetere, la plej ofte uzata *mis*-vorto, *misuzi*, ja ne signifas eraran uzon, sed proprasence malbonan, same ankaŭ *mistrakti*. Tiel oni renkontas *misfarti*, *mistaksi*, *misvivi*, *misposedi* (senrajte p.), *mispaŝo*. Ankaŭ ĉe *misfamo* oni ne pensas pri erare diskonigita famo, sed pri famo malbona.

Tiuj diversaj sencoj de *mis* same ne estigus konfuzon, kiel la diversaj sencoj de *malbone* en *malbone kalkuli*, *malbone kompreni* kaj *malbone konduki*.

M e m s t a r e: *misa*, laŭ la oficiala signifo, estus *malĝusta*, *erara*. Sed en tia senco ĝi apenaŭ estas uzata kaj ŝajnas ankaŭ superflua. Vd. ankoraŭ § 424.

En la poezio oni ĝin uzis jam en la senco **malbona**: *misa konduto*, *misa infano*. Ne estus maloportune uzi ĝin en la poezio tiamaniere, eĉ rezervi al ĝi *nur* ĉi tiun signifon. Tiel oni ricevus radikvorton por la ideo *malbona*, do anstataŭanton por la latinida elemento *mal*, kiu en E-o havas

alian signifon; sed ni devas konstati, ke en 1908 Zamenhof preferis enkonduki, por tiu senco, la neologismon *mava*.

RE

369

Re- signifas:

1. **r e t u r n e**; ekzemple: *repagi* (ŝuldon); *reveni* (el ekskurso); *redoni*; *rebonigi* (meti en antaŭan staton bonan); *remeti* (sur sian lokon); ira kaj *reira* (bileto); *rebati* (argumenton); *refeti* (pilkon, ŝtonon, radiojn); *rebrili*; *resaluti*; *resalti* (pilko, de la tero); *respeguli*, *resendi*, *resendaĵo*; *reteni* (teni reŝove, malhelpante antaŭenpaŝon al intencata celo).

Rim. I. En tiu senco *re*, en la poezio, estas uzata ankaŭ memstare; ekzemple: "*venis fiŝisto re de la duno*"; "*la vilaĝanoj venis el siaj kampoj re*"; "*venis Alkeo mem al virginoj Lesbiaj re*"; "*mi spiritojn vokis, kiel peli re*". Tia memstara *re* estas longe prononcata kiel akcenta silabo.

2. **d e n o v e**: ekzemple: *revidi* (denove vidi); *relegi* (denove legi); *rekotizi* (denove kotizi); *retrovi* (trovi ion perditan); *reformi* (denove formi); *renaskiĝo*; *reviviĝo*; *rememoro*; *rememorigo*; *revendisto*; *refoje* (denov-foje).

Rim. II. Ĉe kelkaj el la supraj formoj la signifo de *re* estas iom alia ol la propra senco, kvankam parenca: *retrovi* (ne duafoje trovi, sed trovi ion kaj konstati, ke oni ĝin jam posedis); *reformi* (ne duafoje formi, nek formi en antaŭan staton, sed doni formon kontraŭan al la spontane evoluinta, opiniante tiun novan formon pli bona); same: *rekoni* (ekkoni ion, kaj konscii, ke oni ĝin jam konas [reekkoni]); ĝi estas uzata ankaŭ metafore: konfesi la valoron de io [agnoski]). *Reteni*, *reciti* estas rigardeblaj kiel memstaraj vortradikoj, ankaŭ eble *retuŝi*.

Rim. III. Oni povas diri, ke *re* estas *resuma* formo por *returne*, en kontraŭa direkto kaj por *denove*, *ripete*. En okazo de neceso oni povas uzi la ekzaktajn formojn: *returne*, *reen*, *retro* kaj *denove*, *refoje*, *ripete*.

M e m s t a r e: *ree* (ĉiam: *denove*); *reen* (ĉiam: *returne*); *rea* (ambaŭsence). Grabowski provis anstataŭ *reen* la formon *ren*, sed ĝi ne enradikiĝis.

Vd. ankoraŭ § 108.

RETRO

370

Retro- estas neoficiala prefiksoido kun la senco:

k o n t r a ŭ e a l l a k u t i m a d i r e k t o; ekzemple: *retroiri* (iri dorsdirekte); *retrofleksi* (dorson); *retroklini* (kapon); *retropaŝi* (fari paŝon dorsdirekte).

M e m s t a r e ĝi estas uzebla kiel adverbo; ekzemple: "*ne cedu retro!*"; "*ni iru al la Eternaj Kalendaroj retro*".

II. RADIKAJ PREFIKSOIDOJ

ĈEF

Ĉef- kiel prefiksoido signifas: la plej granda, plej grava, plej altranga inter similuloj aŭ similaĵoj. Ekz-e: *ĉefministro*, *ĉefpastro*, *ĉefredaktoro*, *ĉefgeneralo*, *ĉefepiskopo*, *ĉefkantisto*, *ĉefserĝento*, *ĉefanĝelo*, *ĉefurbo*, *ĉefstrato*, *ĉefafero*, *ĉefartikolo*, *ĉefpreĝejo* (katedralo).

M e m s t a r e: *ĉefo* (estro), *ĉefa*, *ĉefi* (estri), *ĉefajo*, *ĉefulo* (ĉef-persono).

VIR

Vir- kiel prefiksoido signifas: apartenanta al la generanta sekso.

Ekzemploj: *virĉevalo*, *virkato*, *virbovo*, *virbesto*, *virkanario*, *viransero*, *viranaso*, *virkapro*, *virporko*, *virapro*, *virbirdo*, *virfiŝo*, *virabelo*, *virskarabo*; *virhomo* (kontraste kun *homino*). Vd. § 32, Rim.

Rim. I. Ĝis la unua mondmilito, oni uzis **vir-** kiel ĉefelementon: *ĉevalviro*², *bovo-viro*². Sed, verŝajne pro la kritikoj, kiuj asertis, ke la ĝusta signifo de tiuj kunmetoj estas la *centaŭro* de la greka mitologio kaj la *kerubo* de la asiraj temploj, Z., en sia traduko de la Genezo, iniciatis la multilate pli oportunan prefiksitan uzadon de **vir-**: *virbovo*, *virŝafo*. Tiu uzado tiel disvastiĝis, ke la antaŭe uzatan formon (–*viro*) oni nun jam povas rigardi arkaismo.

Rim. II. Utila estus, en la mastruma faklingvo, prefiksoido signanta la kastritajn bestojn. Aŭstraliaj bredistoj proponis por tiu uzo la sufikson **-uk** (verŝajne tirita el *eŭnuko*), kiu ŝajnas akceptinda: *ĉevaluko*, *ĉevalinuko*; *kokuko*, *kokinuko*, *porkuko*, *bovuko*; *maskluko*, *inuko*.

III. PREPOZICIAJ PREFIKSOIDOJ

Divido

La prepoziciaj prefiksoidoj povas havi kvin specojn de funkcio.

a) Ili povas funkcii apud verbo kiel *adverba adjekto* (*preteriri*: iri pretere). Tiun funkcion ni signos per (*x-e*).

b) Ili povas funkcii apud verbo kiel *predikata adjektivo* (kunveni: veni kunaj). Tiun funkcion ni signos per (*x-a*).

Rim. I. Tiu predikat-adjektivo montras la *rezulton* de la ago: *kunveni*: veni tiel, ke ili iĝas kunaj; *eniri*: iri tiel, ke oni iĝas ena. (Kp.: sin bati *vunda*, piki *morta*). Sekve de tio, ĝi estas preskaŭ samsignifa kun lok-adjekto direkta (-en): *kunveni*: veni kunen, *eniri*: iri enen. Ekzistas, tamen nuanca diferenco: la predikat-adjektivo pli akcentas la *rezulton*, la direkta lokadjekto pli akcentas la *direkton* de la ago. Vd. § 297.

Rim. II. Ĉar la predikat-adjektivo akcentas la rezulton de la ago, ĝi esprimas ankaŭ la finon de la ago (post atingo de rezulto la ago ja ĉesas). Tial, la verboj havantaj prepozician prefiksoidon de predikat-adjektiva signifo, estas rigardeblaj kiel esprimantaj finitan, do, rilate, antaŭtempnan agon (f i n a s p e k t a j v e r b o j, kp. § 109). En tempaj subpropozicioj ilia simpla preterito devas signi antaŭtempcon: *kiam oni alportis la bieron, li verŝis al si*². Samtempecon tiaokaze oni espi-

371

372

373

mas per **dum** (vd. § 247, c.).

Rim. III. Ni jam menciis (§ 363, Rim. I.), ke radikoj nur malofte funkcias kiel adverbadjektaj prefiksoido. Pri la prepozicioj oni tion ne povas diri. Tamen, ankaŭ prepozician prefiksoidon oni komprenas prefere kiel predikat-adjektivon (se tia senco estas ebla). Ekzemple, *kunveni* estas komprenata prefere *veni kunaj ol veni kune*. Tial, por la lasta senco estas preferinde uzi la *plenan* formon (kune veni).

c) Ili povas funkcii *prepozicie*, kiel *maldekstra elemento* de flankelement-duoblo en trielementa vorto: *senkora*: (sen koro)-(a). Ofte tia trielementa vorto iĝas flankkomplekso de *iĝi* aŭ *igi*: *senfortiĝi*: (senforta)-(iĝi). Tie ĉi la funkcion de la prepozicio jam apenaŭ oni povas nomi prefiksoida. Tiun ĉi funkcion ni signos per (*Cx*).

Rim. IV. Prepozicio de adjekto ofte iĝas prefiksoido de predikato, kaj tiam la komplementa substantivo de la prepozicio iĝas la objekto de la predikato prefiksoidhava. Ekzemple: *iri en la ĝardenon*: *eniri la ĝardenon*; *iri sur monton*: *suriri monton*; *esti ĉe kunsido*: *ĉeesti kunsidon*. Tian uzon oni trovas precipe ĉe la prepozicioj *lokaj*. Esceptan neuzon ĉe el kaj de klarigas, ke la akuzativo en E-o montras direkton almovan, do ĝuste kontraŭan al la demova senco de tiuj prepozicioj; tial oni sentus strangaj la esprimojn: *eliri la domon*; *deveni nobelan patron*.

d) Ili povas funkcii laŭ c., sed krome kun *inversa vortefiko*, memstariganta la finaĵon de la posta elemento (pseudopleonasmeco: vd. §§ 304-306). Ekzemple: en *intermonto* la inversa efiko de *inter* memstarigas la o-finaĵon kaj pluraligas la radikon *mont*. La analizo do estas (*inter* [*du*] *montoj*)-(o). La senco de la memstariginta finaĵo evidentiĝas el la senco de la kunmeto. En *intermonto* ĝi estas *spaco*, en *interakto* ĝi estas *tempo*. Tiun funkcion ni signos per (*CxOo*).

e) Ili povas funkcii ankaŭ kiel *maldekstra flankelemento adjektiva*. Ni diris (vd. § 296, C.), ke la baza formo de prepozicioj ĉe ilia pluformado estas la adjektiva formo. Tiu formo validiĝas en tiuj ĉi kunmetoj. Ekzemplo: *kontraŭflanke*: (kontraŭa flanko)-(e). Tiun funkcion ni signos per (*xCa*).

Rim. V. En la funkcioj a) kaj b) la prepoziciaj prefiksoidoj ligiĝas ĉiam antaŭ verbajn radikojn, kiel la prefiksoidoj adverbaj. Kompreneble, la kunmeto povas esti substantivigita kiel tuto: *postkolero*: (postkolero)-o; *interparolo*: (interparoli)-o.

Rim. VI. Prepozicioj povas funkcii ankaŭ kiel veraj prefiksoj (prefiksiĝo). Pri tio vd. § 430.

AL

374

Al- kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): *alparoli* (paroli ale); *albati*, *almezuri*;

b) (x-a): 1. *alesti* (esti ala); *alfali*, *aliri*, *alveni*, *alglui*, *alkonduki*, *almeti*, *alporti*; - 2. *aliĝi*; *aligi*, *alproprigi*; - 3. *aldiri*, *aldoni*, *alkalkuli*, *almeti*, *alnomi*, *alpagi*, *alplenigi*, *alskribi*; - 4. *alfari*, *alĝustigi*, *alkutimigi*, *al-lasi*, *alsimiligi*, *altrancĉi*.

Rim. I. Al kiel prefiksoido estas uzata ne tute proprasence. En la grupo sub 1. ĝi unuigas en si la sencojn de **al** kaj **apud** aŭ **ĉe**; *alporti*: ale porti apuda. – En la grupo sub 2. ĝia senco estas **apartena**: *aliĝi al*: iĝi apartena al... – En la grupo sub 3. ĝia senco estas **krom**: *alpagi*: krompagi. – En la grupo sub 4. ĝia senco estas **laŭ**: *altranĉi*: tranĉi laŭa al...

c) (Cx): *alcela*: (al. celo)-(a); *almona*, *alvala*, *allima* (pago), *altempa*; *albordigi*: (al bordo)-(a)-igi; *alcentrigi*, *alŝtatigi*, *altempigi*, *altabligi*. Vd. Rim. I.

Rim. II. Al ofte estas uzata en la senco **al** si: *alproprigi*: apartenigi al si; alifoje, ĝi povas havi la sencon **al** mi: *alportu*: portu al mi.

Pri **al** kiel vera prefikso vd. § 430.

ANSTATAŬ

Anstataŭ, verŝajne pro sia longeco, apenaŭ funkcias prefiksoido. 375

b) (x-a): *anstataŭi*: esti anstataŭa; *anstataŭigi*: iĝi anstataŭa.

En tiu funkcio oni trovas ankaŭ *vic-* (vd. § 429).

ANTAŬ

Antaŭ kiel prefiksoido funkcias: 376

a) (x-e): *antaŭaranĝi* (aranĝi antaŭe); *antaŭdestini*, *antaŭpagi*, *antaŭvidi*, *antaŭsendi*, *antaŭdiri*, *antaŭzorgi*, *antaŭtimi*, *antaŭjuĝi* (juĝi antaŭe sen informiĝo).

b) (x-a): *antaŭi* (esti antaŭa), *antaŭiĝi*, *antaŭkuri* (kuri antaŭa); *antaŭmeti* (meti antaŭa), *antaŭigi*, *antaŭŝovi*, *antaŭtiri*.

c) (Cx): *antaŭtempa*: (antaŭ [ĝusta] tempo)-(a); *antaŭhistoria*, *antaŭdoma*; *antaŭlasta*: (antaŭ la lasta)-(a); *antaŭhierai*: (antaŭ hier)-(aŭ).

Pri **antaŭ** kiel vera prefikso vd. § 430.

APUD

Apud kiel prefiksoido funkcias: 377

a) (x-e): *apudesti*: esti apude; *apudiri* (muron): iri apude;

b) (x-a): *apudmeti*: meti apuda.

c) (Cx): *apudurba*: (apud urbo)-(a); *apudborda*; *apudvoja*; *apudmara*.

CIS

La neoficiala **cis** (maltrans) povas funkcii: 378

b) (x-a): *cisveni*: veni cisa;

c) (Cx): *cisborda*: (cis bordo)-(a); *cisalpa*, *cisdanuba* ktp.

Rim. Kelkfoje oni anstataŭigas **cis** per **ĝis** (ĝisalpa, ĝisrivera). Tio tamen ne ĉiam estas ebla: *kampo cisrivera* signifas nur, ke la kampo troviĝas maltrans la rivero, dum *kampo ĝisrivera* signifas, ke ĝi sterniĝas tute ĝis la bordrando: *la kampo sterniĝas cis la rivero ĝis la landvojo kaj trans la rivero ĝis la monto*.

- 379** Ĉe kiel prefiskoido funkcias:
- a) (x-e): *ĉeesti*: esti ĉee;
 - b) (x-a): *ĉemeti*: meti ĉea;
 - c) (Cx): *ĉebruste*: (ĉe brusto)-(e); *ĉemane*^Z;
 - d) (CxOo): *ĉebrusto*: (ĉe brusto)-(o).

ĈIRKAŬ

- 380** Ĉirkaŭ kiel prefiksoido funkcias:
- a) (x-e): *ĉirkaŭiri* (iri ĉirkaŭe); *ĉirkaŭbraki*, *ĉirkaŭpreni*, *ĉirkaŭkovri*, *ĉirkaŭsieĝi*, *ĉirkaŭzoni*, *ĉirkaŭbari*, *ĉirkaŭflugi*, *ĉirkaŭĉizi*, *ĉirkaŭligi* (aktojn), *ĉirkaŭmordi*, *ĉirkaŭrigardi*, *ĉirkaŭstari*, *ĉirkaŭŝiri*, *ĉirkaŭveturi*;
 - b) (x-a): *ĉirkaŭŝmiri* (grasaĵon sur brako); *ĉirkaŭplekti*: plekti ĉirkaŭa (festonon sur kapo); *ĉirkaŭmeti*, *ĉirkaŭligi* (ŝnuron);
 - c) (Cx): *ĉirkaŭdoma*: (ĉirkaŭ domo)-(a); k.s.
 - d) (CxOo): *ĉirkaŭbrako* (braceleto), *ĉirkaŭkolo* (koliero), *ĉirkaŭurbo*.
Vd. ankoraŭ § 430.

DE

- 381** De kiel prefiksoido funkcias:
- a) (x-e): *deveni* (de iu): veni dee; *destari*;
 - b) (x-a): 1. *defleksi* (fleksi dea); *deformi*, *deflankiĝi*, *deklini*, *dekonsoli*, *delogi*, *deŝanĝi*, *deŝiri*, *deteni*, *detimigi*, *detiri*, *delasi*, *detrancî*, *deturni*, *deviŝi*, *dekalkuli*, *degrati*, *depreni* ktp. 2. *defali*, *deflui*, *deguti*, *degradi*, *dependi*, *depremi*, *depreni*, *desalti*, *desku*i ktp.
Rim. I. En la formoj sub 1. la signifo de *dea* estas proksimume *for*, *fora* (*dekon-**sili*: forkonsili; *deŝiri*: ŝiri fora); en la formoj sub 2. la signifo de *dea* estas *malsupra* (malsupren): *defeti*: ĵeti malsupren; *desalti*: salti malsupren.
Rim. II. *Delasi* (lasi iĝi fora) anstataŭas la veran sencon de *forlasi*. Ĉi lasta signifas: "lasi iun, forirante", dum *delasi* signifas: "lasi iun foriri, lasi ion foriĝi". Ekz-e: *li delasis la kaptitan malamikon*; *li delasis la gvidilon el la mano*. (Vd. § 367, R. I.).
Rim. III. Anstataŭ *denombri* kaj *deskribi* pli ĝustaj estas *nombri* kaj *skribi*.
 - c) (Cx): *delonge*: (de longo)-(e); *denaska*; *demalproksima*; *detempe* de: (de tempo)-(e) de; *deĉenigi*: (de ĉeno)-(a)-igi; *detronigi*, *deĉevaliĝi*, *devojiĝi*, *decentrokura*: kura je (de) centro.

DUM

- 382** Dum kiel prefiksoido funkcias nur laŭ
- c) (Cx): *dumtaga*: (dum tago)-(a); *dumviva*: (dum vivo)-(a); *dumtempe*. (dum [tiu] tempo)-(e); *dumvoje*: (dum [iro de] vojo)-(e).

EKSTER

383

Ekster kiel prefiksoido funkcias laŭ

c) (Cx): *eksterdome*: (ekster domo)-(e); *eksterlanda* (ekster lando)-(a); *eksterleĝa*, *eksterorda*, *eksterduba*: (ekster dubo)-(a); *eksterordinara*: (ekster ordinario)-(a).

d) (CxOo): *eksterlando*: (ekster lando)-(o).

Rim. Anstataŭ ekster laŭ funkcio b) (x-a) oni uzas la prefiksoidon el (vd. malsupre).

EL

384

El kiel prefiksoido funkcias:

b) (x-a): 1. *eliri*: iri ela (elen); *elbati*, *elĉerpi*, *eldoni*, *elspezi*, *elhaki*, *elklini*, *elkonduki*, *elkrani*, *elpreni*, *elradiki*, *elsendi*, *elspiri*, *elŝiri*, *elŝovi*, *elŝteli*, *elŝuti*, *eltiri*, *eltranĉi*, *elverŝi*, *elfali*, *elflui*, *elgliti*, *elgrimpi*, *elkuri*, *elmigri*, *elnaĝi*, *elpaŝi*, *elrampi*, *elsalti*, *elveni*, *elradii*; – 2. *elelekti*, *eltrovi*; – 3. *elalmozi*, *eldevigi*, *elflari*, *elflati*, *elpeti*, *ellogi*; – 4. *elmeti*, *elmontri*, *elparoli*, *elbalbuti*, *elĝemi*, *elplori*, *eldoni*, *elkovi*; – 5. *elpensi*, *ellabori*, *elforgi*; – 6. *elstreĉi*, *eletendi*, *elrektigi*, *elglatigi*; – 7. *eldemandi*, *elaŭskulti*, *elesprimi*, *elkreski*, *elfari*, *ellerni*, *ellegi*, *elpagi*, *elprovi*, *elsekigi*, *elturmenti*; – 8. *elteni*, *elsuferi*, *elporti*; – 9. *eluzi*, *ellasi*, *elviŝi*, *elstreki*, *elvaporigi*.

La metaforaj sencoj de el klarigas ĝiajn diversajn signifojn en la supraj 9 grupoj:

1. El estas uzata proprasence: *ela* (elen, eksteren). Ĝi signas diference de la direkta adjekto, ke la rezulto de la ago efektiviĝis (vd. § 373, Rim. II.): *eliri*: iri eksteren kaj iĝi ekstera.
2. El signifas: *el inter*; *eltrovi*: trovi el inter la eblaĵoj.
3. El signifas: akiri (kvazaŭ eligi el iu) ion deziratan; *elflati monon* de iu: eligi per flato monon de iu. En tiu ĉi senco oni uzas ankaŭ *per:perflati*, *permiliti*.
4. El signifas: manifesti, malkaŝi; *elmeti*: malkaŝi per la efiko de io; *elparoli*: manifesti per parolo.
5. El signifas: krei per; *elpensi*: krei per pensado.
6. El signifas: laŭ la plena longo; *eletendi*: etendi laŭ la plena longo; *elglatigi*: glatigi laŭ la plena longo.
7. El signifas: plene, elĉerpe: *elkreski*: plene kreski; *ellerni*: plene lerni. Vd. ankoraŭ ĝis kaj tra.
8. El signifas: povi fari ĝisfine; *elporti*: povi porti ĝisfine. En elporti kaj elteni *porti* kaj *teni* estas metafore uzataj anstataŭ *toleri*.
9. El signifas: ĝis difektiĝo, malapero; *eluzi*: difekti per uzado; *elviŝi*: malaperigi per viŝado. Vd. ankoraŭ for.

c) (Cx): *elĉenigi*: (el ĉeno)-(a)-igi; *elartikigi*, *elŝipigi*, *elvagoniĝi*, *ellitiĝi*, *elingigi*, *eldanĝerigi*, *elrevigi*: (el revo)-(a)-igi.

Tie ĉi el estas uzata anstataŭ la (pli peza) ekster. *Ellitiĝi* ktp. propre devus esti *eksterlitiĝi*: (ekster lito)-(a)-igi. Kp. *enlitiĝi*.

385 En kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): *enhavi*: havi ene; *enkovri*: kovri ene; *enteni*, *enkaŝi*, *enfortikigi*, *enflari*, *enfermi*, *enŝlosi*; *eni*: esti ene;

b) (x-a): *eniri*: iri ena (enen); *enspezi*, *enblovi*, *enfosi*, *engluti*, *enjungu*, *enĵeti*, *enkalkuli*, *enkonduki*, *enlasi*, *enmeti*, *enmiksi*, *enpeli*, *enpiki*, *enplekti*, *enporti*, *enpremi*, *enskribi*, *enspiri*, *enŝovi*, *enŝprucigi*, *enŝteli*, *enŝtopi*, *entranĉi*, *enverŝi*, *envolvi*, *entrudi*, *envesti*; *ensorĉi*: sorĉi en ian situacion; *enradikiĝi*;

c) (Cx): *enabismiĝi*: (en absimo)-(a)-iĝi; *enbuŝigi*, *enkasigi*, *enkorpigigi*, *enkudriligi*, *enmanigi*, *ennebuliĝi*, *ennoktiĝi*, *enterigi*, *entombigi*, *envagoniĝi*, *enŝipigi*, *enretiĝi*, *enamiĝi* (iĝi enama); *enprofundiĝi*, *enpensigi*: (en penso)-(a)-iĝi; *enloĝiĝi*: (en loĝ[ej]o)-(a)-iĝi; *endormigi*, *envetur[il]iĝi*.

Rim. La strukturo de *enamiĝi* (iĝi enama) klare montras, ke ĝia nerekta objekto ne povas esti *en iun* (ĉar *en* rilatas tie ĉi al *amo*), sed *al iu* aŭ *je iu*, eĉ, eble, *pri iu*. Vd. ankoraŭ § 430.

386 Ĝis kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): *ĝisatendi* (iun): atendi ĝise (ĝis lia veno); *ĝisvivi* (ion): vivi ĝise (ĝis ĝia okazigo); *ĝisporti* gravedecon: porti ĝin ĝis la regula tempo de la nasko; *ĝisiri*, *ĝiskuri*.

c) (Cx): *ĝisfina*: (ĝis fino)-(a); *ĝisgenua*; *ĝisosta* (ĝisostulo); *ĝisnuna*, *ĝis-tiama*; *ĝisposte*: (ĝis poste)-(e); *ĝisplue*; *ĝismorta*, *ĝissate*, *ĝistroe*, *ĝislaste*, *ĝisfunde*, *ĝisplene*.

Rim. Ĝis estas uzata ankaŭ en la senco *maltrans*: *ĝisalpa*, *ĝisdanuba*. Anstataŭ tiel uzata ĝis estus preferinda la prefiksoide uzata nova prepozicio *cis* (vd. § 378).

387 Inter kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): 1. *interrompi*, *interhelpi*, *interagi*, *interdiri*; – 2. a): *interparoli*, *interkonsenti*, *interbatali*, *interdisputi*, *interirilati*, *interpaciĝi*; – 2. b) *interbati* (manojn), *interkaresi* (manojn), *interŝanĝi*, *interligi*, *interpremi*, *interpuŝi*, *interkonfuzi*, *intermiksi*; – 2. c) *intervidiĝi* (kun) aŭ *sin intervidi* (kun); *interkomunikiĝi*; *interkonsiliĝi*, *interpuŝiĝi*, *intersekvi*; *interbati sin*, aŭ *interbatiĝi*; *inter respondi*.

En la formoj sub 1. la signifo de *inter* estas: *inter la komenca kaj fina punkto de la ago, meze*. Do: *interrompi*: rompi inter komenco kaj fino, meze, ne lasante fini; *interdiri*: diri ion inter la fina kaj komenca punkto de (do *meze de*) la parolo de iu alia. – En la formoj sub 2. la signifo de *inter* estas: *inter si, reciproke*. – En la grupo 2. a) la *inter*-kunmeto esprimas netransitive la agon de du subjektoj: *ili interparolas*: ili parolas

unu kun la alia. — En la grupo 2. b) la *inter*-kunmeto esprimas *transitive* agon direktatan al du objektoj (unu kaj alian; unun al, je, kun la alia): *interfroti manojn*: froti manojn unu al la alia. — En la grupo 2. c) la *inter*-kunmeto esprimas transitivan agon rilatantan refleksive al du subjektoj. Tie do oni devas signi la refleksivecon per *sin* aŭ per *iĝi*: *intervidiĝi* aŭ *sin intervidi*: vidi sin reciproke, vidi unu la alian. Kelkfoje oni ellasas la markadon de refleksiveco: *ili interbatadis*, *interkisis*, *interrenkontis*, *interrigardis*, *interrespondis*, aŭ la medialon: *interkomuniki*, *interkonsili*. Sed, krom tiuj ĉi kelkaj formoj, tio estas evitinda; malĝusta estus: *ili interligis* — anstataŭ: *ili interligiĝis*.

Rim. I. *Interrompi* estas uzata ankaŭ *metonimie*, rilatigite al la *aganto*: interrompi *iun* (ies parolon, kanton, agon).

b) (x-a): *intermeti*: meti intera (interen); *interveni*: veni intera (helpi aŭ malhelpi per tien-veno); *interbuki*: buki intera, *interfiksi*, *interpreni*.

c) (Cx): *internacia*: (inter nacioj)-(a); *interkontinenta*, *interplaneda*, *interparlamentata*; *intergenta*, *interhoma*; *interalie*: (inter alioj)-(e).

d) (CxOo): *interferdeko*: (spac)-o inter du ferdekoj; *intermonto*, *interetaĝo*, *interlinio*, *interkolono*, *interripo*; *interakto*: (temp)-o inter du aktoj; *interrego*: (temp)-o inter du reg(ad)oj;

e) (xCa): *intertempe*: (intera tempo)-e.

Rim. II. Kiel oni vidas, la senco de la memstarigita o-finaĵo estas jen *spaco*, jen *tempo*, laŭ la signifo de la radikoj.

Pri *inter* funkcia kiel vera prefikso vd. § 430.

JE

Je, pro sia nedifinita senco, apenaŭ povas esti uzata kiel prefiksoido. Oni ĝin trovas nur en la vorto *jeĵuri*. *Jeĵuri kontraŭ iu* (konspiri kontraŭ iu). *Jeĵuri al iu* (ĵuri fidelon al iu). *Jeĵuri por io*: sin ĵure devigi por la faro de io.

388

KONTRAŬ

Kontraŭ havas diversajn signifojn:

389

a) (x-e): 1. *kontraŭiri*, *kontraŭnaĝi* (fluon), *kontraŭkuri*; — 2. *kontraŭbatali*, *kontraŭstari* (malcedi), *kontraŭagi*, *kontraŭparoli*, *kontraŭdiri*, *kontraŭrigardi*, *kontraŭefiki*, *kontraŭdirekti*.

En la grupo sub 1. **kontraŭ** signifas *kontraŭdirekte*. En la grupo sub 2. ĝi signifas *kontraŭefike*, *malamike*.

b) (x-a): *kontraŭmeti* (meti kontraŭa); *kontraŭfeti*, *kontraŭiĝi*; *kontraŭi* (esti kontraŭa).

Tie ĉi **kontraŭ** signifas ĉiam *kontraŭefika*.

c) (Cx): *kontraŭvole* (kontraŭ volo)-(e); *kontraŭflue*, *kontraŭvizaĝe*, *kontraŭmilita*.

Tie ĉi **kontraŭ** povas havi la sencojn: **k o n t r a ŭ d i r e k t e** (*kon-*

traŭflue); kontraŭefike (*kontraŭmilita*).

d) (CxOo): *kontraŭveneno*: (rimed)-o kontraŭ veneno.

e) (xCa): *kontraŭflanke* (kontraŭa flanko)-(e); *kontraŭsitua* (kontraŭa situo)-(a); *kontraŭpozicia*.

Tie ĉi **kontraŭ** havas lokan signifon (transe).

Vd. ankoraŭ § 430.

KROM

- 390** **Krom** funkcias preskaŭ ekskluzive kiel vera prefikso (vd. § 430). Anstataŭ *kromnomi*, *krompagi*, *kromkalkuli*, *kromskribi*, *kromdoni* ktp. oni kutime uzas formojn kun **al-** (vd. § 374).

KUN

- 391** **Kun** kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): *kunludi* (ludi kune); *kunesti*, *kuniri*, *kunokazi*, *kunsidi*; *kunlabori*, *kunmiliti*, *kunbatali*, *kunverki* (kune samcele); *kunpreni*, *kunporti*, *kuntreni* (kune kun si).

b) (x-a): *kuntiri*: tiri kuna (tiri tiel, ke ĝi iĝu kuna); *kunkreski*, *kunmeti*, *kunrasti*, *kunforĝi*, *kunnajli*, *kunniti*, *kunfandi*; *kunveni* (veni kunaj), *kunamasigi*, *kunfali* (detruigi), *kunkuri*; *kunvoki*, *kunvenigi* (venigi kunaj); *kunigi* (igi kuna).

Rim. I. La dusencecon de **kun-** (x-e kaj x-a) Z. rigardis difekto de la lingvo, pri kiu oni devus helpi. Kelkfoje li uzis **kune-** anstataŭ **kun-**, tamen – strange! – li ne utiligis tiujn du formojn por meti diferencon inter la du sencoj, sed aplikis **kune-** sendistinge (*kunesido*, *kunevivado*, *kuneeduki*; *kunekroĉi*, *kunekalkuli*, *kunepreni*), verŝajne sub la influo de la germana, kiu havas mit- (x-e) kaj **zusammen** (x-a), sed uzas ofte la lastan en la senco de **mit-**. En la "neologismaj" projektoj, Z. proponis por la dua senco diversajn solvojn (**ko-**, **kum-**), fine, en la dua volumo de la Andersen-fabeloj lanĉis **kunkun-** (*kunkunvoki*). Neniu el tiuj iniciatoj estis imitata. Kelktempe disvastiĝis, laŭ la propono de Minor, la uzo de **kune-** en la dua senco, kio estas evidente eraro: **kune-** emfazas ja ĝuste la unuan sencan (*kuneveni* = veni kune!). La duan sencan neprigus **kunen-**, sed ankaŭ ĉi tiu ne estas uzebla, ĉar ĝi ŝajnas kunmetita el du prepozicioj (*kun* kaj *en*), do *kunenvenis* ŝajnus signifi: kune envenis. Pli konsilinda ŝajnus en la dua senco **alkun-** (do: *kunveni* = veni kune, *alkunveni* = al la sama loko). Sed estus domaĝe misformi la tiel kutimajn *kunveni*, *kuntiri*, *kunvoki* ktp. per la antaŭmeto de **al-**. Oni povas tute trankvile lasi la nunan staton, sed, por eviti konfuzon, oni uzu *kun-* laŭ senco *x-e* nur en la supre cititaj vortoj, aliokaze oni uzu ĉi-sence ĉiam *kune* aŭ *kun si* (veni kune, tiri kun si [kuntreni]). La kunmeton *alkun* oni povus uzi memstare: *kuri alkune*; *alkune!*

c) (Cx): *kuntara*: (kun taro)-(a); *kunŝtona*; *kunfolia* (arbo).

Rim. II. Krom *kuntara*, tiuj ĉi formoj ne estas uzataj, ĉar la nuanco de *alkuneco* tie ne estas perceptata, dum la malaj formoj kun *sen-* estas komunuzaj (*senfolia arbo*). Oni uzas prefere *-hava* ĉi-sence (ŝtonhava, folihava ktp.).

Vd. ankoraŭ § 430.

LAŬ

Laŭ kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): *laŭiri* (riveron): iri laŭe (de rivero).

b) (x-a): *laŭfari*: fari laŭa; *laŭĝustigi*: ĝustigi laŭa; *laŭtranĉi*, *laŭmezuri*, *laŭigi*; *laŭi*: esti laŭa.

Rim. En tiu ĉi senco prefere oni uzas al: *alfari*, *alĝustigi*, *altranĉi*, *almezuri*.

c) (Cx): *laŭmoda* (laŭ modo)-(a); *laŭsence*, *laŭmezure*, *laŭpeze*, *laŭdezi-re*, *laŭordone*, *laŭvole*, *laŭmerite*; *laŭeble*: (laŭ eblo)-(e); *laŭlonge* (laŭ longo)-(e); *laŭlarĝe*.

MALGRAŬ

Malgraŭ troviĝas prefiksoido nur en la kunmeto (Cx): *malgraŭvola* (malgraŭ [sia] volo)-(a); *edziĝo malgraŭvola*, *kuracisto malgraŭvola*.

PER

Per funkcias prefiksoido nur laŭ (Cx); ĝi montras, ke la ideo de la posta radiko servas kiel rimedo por io: *perlabori*: (per laboro)-(e)-i: akiri per laboro; *perforti*: (per forto)-(e)-i: agi per forto; *perflati*, *perludi*, *permi-liti* (akiri per flato, ludo, milito); *pervoĉdona*^z: (per voĉdono)-(a); *persekunda*, *perhora rapideco*.

Rim. I. Per povas stari ankaŭ ĉe substantivaj radikoj: *perletere* (sciigi), *perbastone* (bati), *perkrajone* (skribi). Sed tiaj formoj estas superflujaj longigoj, ĉar la adverba formo jam sola havas la saman signifon.

Rim. II. *Perforto* estas substantivigo de *perforti*: (per-forti)-(o).

Rim. III. La vorto *peri* estas speciala kazo, ne analoga al la aliaj prepozicio-verboj. Ĝi ne signifas *esti* x-a, sed *esti* "la" x. Ne: *esti* per, sed: *esti* tiu, *per* kiu la ago okazas. Dum *ekz-e anstataŭi* signifas "esti anstataŭ io", *peri* ne signifas "esti per io". (Kp.: *mi anstataŭas lin*: *mi* estas anstataŭ li; *mi peras negocon*: *la negocon* estas per mi). Tial oni povas diri, ke *peri* estas devenigita el aparta verba radiko *per'*. Ĉiuj pluformadoj: *pere*, *pera*, *senpera*, *peranto*, *peristo* estas devenaĵoj de tiu *verba per*.

Rim. IV. Kiel ni vidis, *per* povas havi inversan vortefikon antaŭ verbradiko kaj memstarigi la verbfinaĵon:

perlabori = (per→ labor-o)-e-i

tiel do al la verbfinaĵo rilatas la antaŭa elementkomplekso kiel adverbfinaja kunmeto:

perlabore -i = -i perlabore.

Tiu -i estas interpretebla tre elastsence: agi, akiri, funkcii. Oni do povus al ĝi doni ankaŭ la sencon *komplete fari*, do per ĝi esprimi la perfektan aspekton.* Ekz-e: *perlegi*, *perkonstrui*, *perkolekti* signifus *fari kompletan*, *finitan agon lege*, *kons-*

* Tamen la il-senceco de *per* estis tro forta, por ke tiu propono povu prosperi. Vidu § 109. G. W.

true, kolekte. Tio estigus nenian sencokolizion kun la supraj vortoj (*perlabori* ktp.); cetero ĉi tiuj estus facile eviteblaj: *flatakiri* aŭ *elflati*, *ludgajni*, *almiliti* aŭ *konkeri*. Anstataŭ *perlabori*, kiu ne estas tre populara (ofte oni diras *gajni*) oni povus uzi la neologismon *lukri*.

PO

395 Po funkcias prefiksoide nur laŭ (Cx): *vendi varon pogrande^Z, pomal-grande, popece, pometre, poskatole; aliĝi pomembre, pogrupe; preni medikamenton pogute, pokulere; preni tablojdon poduone; lerni ion poiom aŭ poiome (= iom post iom)*.

Oni povas almeti **po** ankaŭ al numeraloj por indiki, ke la respektiva nombro montras nur parton de sia pluroblo: *ili trinkis pounu glason; pagi pokvindek groŝojn por dek vortoj de depeŝo aŭ 50 groŝojn por podek vortoj de depeŝo*.

Rim. I. Per tia prefiksoida uzo oni povas evidentigi, ke **po** rilatas nur al la numeralo, do ĝi ne influas la kazon de la postnumerala substantivo.

Rim. II. **Po** estas uzebla nur antaŭ kvantesprimoj indikantaj parton de sia plimalpli difinita pluroblo, sed neniam antaŭ la unuo, al kiu rilatas la distribuitaj partoj. Do: *labori poses horojn tage* (ne: *ses horojn potage*); *veturi po cent kilometrojn hore* (ne: *cent kilometrojn pohore*). Oni diru: *persekunda, perhora rapideco* (ne: *posekunda, pohora*); *porhora, pormonata salajro* (ne: *pohora, pomonata*).

POR

396 Por apenaŭ estas uzata kiel prefiksoido.

a) (x-e): *porparoli* (pledi), *porpeti*;

b) (x-a): *pormeti* trinkaĵon: meti antaŭ iun, por ke li trinku; *porkovri* (tablon por manĝo); *porskribi^Z*;

c) (Cx): *porĉiama*: (por ĉiamo)-(a); *poreterna, porhonore^Z; porsana^Z; pormemoraĵo^Z; poroportuna^Z; porvivaĵo^Z; portaga, pormonata, porjara salajro*;

d) (CxOo): *porvivoj*: (por vivo)-(oj): vivnecesaĵoj.

POST

397 Post kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): *postiri, postrigardi, postsekvi, postkuri, postsopiri* (bedaŭri), *postkoleri* (venĝemi); *postgusti*;

b) (x-a): *postresti*: resti posta; *postvivi, postlasi*: lasi postmorte aŭ postforire post si;

c) (Cx): *postmorta*: (post morto)-(a); *postfesta, posttabla* (postmanĝa);

d) (CxOi): *postrikolti*: (rikolt)-i postrikolte.

Vd. ankoraŭ § 430.

PRETER

398

Preter kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): *preteriri*, *preterkuri*, *pretermarŝi*, *preterpasi*, *preterpaŝi*, *preterŝovi*, *pretergliti*, *preterflugi*, *preterrigardi*, *pretervidi* (ne vidi pro preterrigardo), *preteratenti* (ne atenti pro alidirekta atentado);

b) (x-a): *preterlasi*: lasi preter(irant)-a sen kapto de l' okazo, ne uzi, ne menci; *preteri*: esti (en movo) pretera;

c) (Cx): *pretervole*^Z: (preter volo)-(e) (nevole).

PRI

399

Pri kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): *prisilenti* ion: silenti pri io. Kiel montras tiu ĉi ekzemplo, *pri*-kiel ankaŭ aliaj prefiksoidoj, faras el ne-rekta objekto objekton rektan. Tiel funkciante, ĝi povas fari el netransitiva verbo transitivan (*prisilenti* ion), aŭ rilatigi transitivan verbon senpere ne al ĝia rekta, sed al ĝia nerekta objekto; tiaokaze ĝi subkomprenigas la ellasitan rektan objekton: *prikanti* ion (kanti poemon pri io).

Specialaĵo de *pri*- estas, ke ĝi, kiel prefiksoido, respondas ne nur al la prepozicio *pri*, sed al ĉiuj prepozicioj, kiuj formas nerektajn objektojn (demovaj: *de*, *el*; almovaj: *al*, *por*). Tiujn nerektajn objektojn ni nomas ankaŭ adjektoj koncernaj (vd. §§ 176, 179). Tial oni povas diri, ke *pri* estas *prefiksoido koncerna*.

aa) *Pri*- respondas al *pri*-adjekto, el kiu ĝi faras objekton rektan: *priparoli*: paroli pri...; *pripensi*; *priŝanĝi* (la popolon); *primediti*, *prisilenti*, *priŝanĝi*, *priŝanĝi*, *priŝanĝi*, *priŝanĝi* (gazeton); *priskribi* (pejzaĝon), *prijuĝi* (verkon).

bb) *Pri*- respondas al movan adjekton: *prilumi** (ĉambro): lumi por ĉambro; *pripluvi* (kampon); *priplanti* ĝardenon (planti planton al ĝardeno); *prikonstrui monton* (konstrui domojn al monto); *priverŝi* florojn (verŝi akvon al floroj); *pridonaci* iun per io (donaci ion al iu); *prijeti* iun per io (jeti ion al iu); *prisemi* teron per tritiko (semi tritikon al la tero).

Rim. I. La origina rekta objekto ofte ne estas esprimita, ĉar ĝi estas evidenta el la verbesenco (planti planton, kanti kanton ktp.). Se ĝi estas esprimita, ĝi ricevas la formon de instrument-adjekto (*per*): *prikanti heroon per odo* (kanti odon pri heroo); *prikonstrui monton per domoj*.

* *Prilumi* povas nur io havanta propran lumon. Oni povus fari la distingon: *lumigi*: igi lumanta; *lumumi*: provizi per lumo de io; *prilumi*: provizi per sia lumo; *lumizi*: provizi per lumanta materialo. Ekzemple: *Kioma horo? Ĉu vi havas lumizitan horloĝon?* – *Ne. Sed ne necesas lumigi la lampon por lumumi la ĉambro; flankentru la kurtenon, la luno prilumos la cifereplaton.* – Sed oni prefere diras: *ekbruligi* (lampon), kaj *lumigi* (ĉambro per lampo).

Rim. II. Inter la simpla formo (skribi pri...) kaj la prefiksoida (priskribi [per]) estas sentebla diferenco. La prefiksoida formo esprimas agon pli plenan, pli fundan, pli drastan: *li ne priparolis la aferon, nur parolis pri ĝi* (li ne diris ĉion direblan kaj gravan pri la afero, li diris nur plurajn frazojn pri ĝi, sensisteme).

cc) **Pri-** igas rekta objekto demovan nerektan objekton: *prifalĉi* kampon (falĉi de kampo herbon), *prirabi* iun (rabi de iu ion), *pristeli* iun; *priserĉi* ies poŝojn (serĉi de ies poŝoj la enhavon); *pritondi* kapon, ŝafojn (tondi de kapo, de ŝafoj la harojn, la lanon); *primanĝi* teron (manĝi de tero la fruktaĵojn); *prikalkuli* popolon (kalkuli de popolo la nombron).

Rim. III. **Pri-** ĉi-sence servas por akcenti la nerektan objekton. En "ŝteli de la mastro monon" la akcento estas sur "mono", en "pristeli sian mastron" la akcento estas sur "mastro".

dd) **Pri-** estas uzata ankaŭ por signi sencon parencan, sed diferencon de la simpla verbo: *prirespondi* (respondumi, respondi), *prifrap* (mallaŭdi), *pririgardi* (esplori), *prifuri* (voti), *pritranc* (tondi [branĉon]); *prikalkuli* (antaŭkonsideri [agon]). Kvankam zamenhofaj, tiuj ĉi formoj ŝajnas ne tute klaraj; oni uzu anstataŭ ili prefere la parentezajn formojn.

b) (x-a): La sola tia formo estus *prii* (esti pria; koncerni): *la afero ne prias min*. Tiu ĉi formo ĝis nun ne estis uzata;

c) (Cx): *prinutra* (problemo): (pri nutro)-(a); *prielekta* aranĝo; *pridecida* hezitado; *privetera* antaŭdiro. Ĉi-sence la senco de *pri-* estas *rilata al...* Sed ĝi ne povas signi *posedan* rilaton, oni do ne povas diri *privarma* radio, *priacida* radiko (vd. § 433).

PRO

400 **Pro** kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): *proparoli* (pledi); *propeti* (peti iun favore al iu).

Rim. Tiuj ĉi formoj akcentas plie, ke la peto aŭ parolo okazas pro (anstataŭ) iu. La samaj verboj kun *por* akcentas plie, ke la ago okazas en ies intereso.

b) (Cx): *propeka* kapro: (pro peko)-(a): pek-absolva; *promalĉasta* donaco: (pro malĉasto)-(a): donita pro malĉasta servo; *proprunte*.

SEN

401 **Sen** kiel prefiksoido funkcias:

b) (x-a): *senigi*: igi sena; *seniĝi*, *seni*: esti sena.

Rim. *Seni* povus esti uzata anstataŭ *malhavi* (ne nur ne havi, sed ankaŭ senti la mankon de io).

c) (Cx): *senhoma*: (sen homoj)-(a); *senvoja*; *senkarna* fingro, *senbarba*, *senekzempla*, *senkorpa*, *senfunda*, *senmakula*, *senmateria*, *senpartia*, *sensenca*, *senpasia*; *senaga*: (sen ago)-(a); *senbrila*, *sendorma*, *sencela*, *senĉesa*, *sendanka*, *sendefenda*, *senefika*, *senekzerca*, *senfina*, *senhelpa*, *senhonta*, *senkompata*, *senmorta*, *senmova*, *senokupa*, *senprepara*, *sen-*

prokrasta, senpuna, sensignifa, senzorga, sendependa, seninterrompa, senpartoprena, senscia; senforta: (sen forto)-(a); *senkulpa, senlaca, senpera, senprudenta, sensperta, sensprita, senutila, sencerta, sentaŭga, senrara, sengrava, senbela*;

senhaŭtigi: igi senhaŭta; *senbarbigi, senhomigi; senbriligi*: igi senbrila; *senmovigi, senherediĝi, senkulpigi, sendependigi, senzorgigi; senkuraĝigi*: igi senkuraĝa; *sentaŭgigi, senfortigi*.

d) (CxOo): *senpovo*: (sen povo)-o: senpoveco; *senvolo, senforto, sendependo, senmovo, senscio*.

SUB

402

Sub kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): 1. *subporti*: porti (de) sube; *subteni*: teni (de) sube (apogi); *sublevi*: levi (de) sube; *subkuŝi*: kuŝi sube; – 2. *subaŭskulti*: aŭskulti sube; *subridi, subparoli, subvendi, subrigardi, subaĉeti*.

En la grupo sub 2. la signifo de *sube* estas *kaŝe, spione, sekrete*. – *Subteni* kaj *sublevi* havas ankaŭ sencon metaforan (helpi).

b) (x-a): *subiri*: iri suba (suben); *subskribi, subkompreni, submeti, subordi, subpremi*.

Subkompreni signifas kompreni sencon kaŝigantan sub la vortoj; *submeti* kaj *subpremi* havas ankaŭ sencon metaforan (meti, premi sub sian potencon).

c) (Cx): *subtera* (sub tero)-(a); *submonta, subpieda, subtegmenta, subsenca, subakva* ktp. – *Subakvigi*: igi subakva; *subtabliĝi* (post drinko).

d) (CxOo): *suboficiro*: (sub oficiro)-o: (soldat)-o sub oficiro; *subleŭtenanto*.

Tie ĉi **sub** signifas suban *rangon*.

Vd. ankoraŭ § 430.

SUPER

403

Super kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e):

1. *superstari*: stari supere al ...; *superpendi, superflugi* domon;

2. *superforti, superbrili, superpasi, superregi, superruzi, superi*.

En la grupo sub 2. **super-** signifas metaforan superecon.

b) (x-a): *superŝarĝi, supersaturi, superverŝi, superresti, supernutri, superflui* (*superflua*: superanta la bezonon).

Tie ĉi **super-** signifas troecon.

c) (Cx): *supernatura*: (super naturo)-(a): *superhoma; superabunda*: (super abundo)-(a); *superbela*.

Tie ĉi la senco estas metafora.

Vd. ankoraŭ § 430.

404 Sur kiel prefiksoido funkcias:

b) (x-a): *suriri* monton: iri sura (suren); *surmeti*: meti sura; *surflugi*, *surverŝi*, *surfeti*, *surpafi*; *suri* (esti sura).

Rim. Sur kiel prefiksoido igas la lok-adjekton rekta objekto (suriri monton: iri sur monton). Tion ĝi povas fari ankaŭ, se ekzistas en la frazo rekta komplemento; tiam la rekta komplemento igas instrument-adjekto: *surverŝi florojn per akvo* (verŝi akvon sur florojn); *surfeti iun per ŝtonoj* (feti ŝtonojn sur iun).

c) (Cx): *surmonta*: (sur monto)-(a); *surtegmenta*; *surtabligi*: igi surtabla.

405 Tra kiel prefiksoido funkcias:

a) (x-e): *trahaki*, *trairi*, *trakuri*, *tralasi*, *trapasi*, *trafranĉi*, *traveturi*, *traflugi*, *tradormi*, *trababili*, *tradanci* (tempon); *tranokti*, *tralabori* (tagon), *trasonĝi* (nokton), *travintri*.

En tiuj ĉi ekzemploj *tra(e)* signifas: de la komenca ĝis la fina punkto aŭ momento. Pro tiu ĉi senco de tra oni povas ĝin uzi ankaŭ por signi plenan plenumon de ago: *tralegi* (libron), *tralerni* ion, *trarigardi* (muzeon), *traskribi* (paĝon), *tramanĝi* (tagmanĝon), *trafrostiĝi*. Nekonsilinda estas tia uzo, kiam la ago rezultigas malaperon de io; tiam oni uzu *for* (*fordandi* monon; *fordiboĉi* havaĵon; la domo *forbrulis*; tineoj *formanĝis* la tapiŝon).

Rim. I. Ĉar tra tiaokaze signas plenan faron, ĝia simpla preterito (kun *kiam*) signas antaŭtempecon. Samtempecon oni esprimas per *ĉu* (vd. § 247, c.).

Rim. II. Tra-verbo kun sur-adjekto signifas, ke la ago okazas sur la ebena signita de la sur-adjekto, kaj tra la spaco, kiun ĝi limas: *trairi sur la planko*: trairi la ĉambron sur la planko; *la globeto traruliĝis sur la tablo*: ruliĝis sur la tablo de unu rando ĝis la alia; *larvoj trafluis sur la vizaĝo*; *muŝo trakuras sur la fenestro*; *inko trafluis sur la paĝo*. *Trans*, uzata ofte ĉi-sence, estas nekorekta.

c) (Cx): *tranokta*: (tra nokto)-(a); *tramara* vojaĝo, *trakampa* promeno, *tranuba* sunbrilo.

Vd. ankoraŭ § 109.

406 Trans kiel prefiksoido funkcias:

b) (x-a): *transiri*: iri transa (transen); *transfeti*: feti transa; *transpasi*, *transalti*; *transplanti*, *transdoni*, *transporti*, *transverŝi*, *transskribi*, *transformi*, *transdiri*, *transvivi*, *transpreni*, *transatendi*; *transiĝi* aŭ *transi* (iĝi transa).

Kiel oni vidas el la supraj ekzemploj, *trans-* signifas: 1. postlasi aŭ celi postlasi disigan objekton (*transiri riveron*); 2. meti de loko sur alian (*transplanti floron*); 3. meti el stato en alian (*transformi*); 4. pasigi de unu persono al alia (*transdoni*).

c) (Cx): *transmara*: (trans maro)-(a); *transviva*, *transtera*, *transtomba*

amo, *translima, transrivera, transkapiĝi* (iĝi transkapa).

d) (CxOo): *transrivero*: (trans rivero)-o: (spac)-o trans rivero. *Transriveranoj*.

IV. PSEŬDOPREFIKSOIDOJ

Kelkaj ne-E-aj elementoj plurfoje ripetigās ĉe la komenco de vortoj, tiel ke ili ŝajnas prefiksoidoj. Ekzemple: *aŭto* (*aŭtobiografio, aŭtomobilo, aŭtonomio, aŭtodidakto, aŭtokrato, aŭtografio*); *pre* (*precedenco, prediki, prefekto, preferi, prefikso, prelegi, preludo, premisio, prepozicio, preskribi, preteksto, prezidi*). El la **pre**-vortoj la dise presitaj ŝajnas esti kunmeto de **pre** kun E-a radiko. Ne estas maleble, ke pli-malpli frue, oni provos laŭ ilia analogio ankaŭ aliajn similajn formojn: *previdi, preokupi* (antaŭokupi), *prejuĝi* (antaŭjuĝi), *presigno* (antaŭsigno), *predestino, prepagi, prezorgi, predati*. Tio estus uzo de elemento kaŝe jam ekzistanta en la lingvo.

407

III. LA DERIVADO

Kiel ni diris, malgranda parto de la elementoj ne obeas la regulojn de la vortkunmeto (VER.). Tiujn oni povas nomi *veraj afiksoj*, kaj ilian funkcion *derivado*.

Oni povas distingi *verajn sufiksojn*, kiuj ligiĝas al la fino de la radiko, kaj *verajn prefiksojn*, kiuj ligiĝas antaŭe.

Analogaj al la veraj prefiksoj estas la adjektivoj aŭ prepozicioj, kiuj ankaŭ ne obeas tiujn regulojn, kaj prezentas en la lingvo kvazaŭ fremdajn korpojn: ni studos ilin sub la titoloj *prefiksiĝo de radikoj* kaj *prefiksiĝo de prepozicioj*.

Fine ni diros kelkajn vortojn pri la internaciaj grekdevenaj prefiksoj, kiuj en E-o povas aperi kiel *pseŭdoprefiksoj*.

VERAJ SUFIKSOJ

Difino

- 409** Veraj sufiksoj en E-o estas **aĉa, ega, eta, um** kaj la neoficiala **ifi**; krome, tien ĉi ni povas kalkuli la *karesajn sufiksojn* (ĉj, nj) kaj la *numeral-sufiksojn* (obl, on, op). Ĉi lastajn vidu §§ 86-87.
Aĉa, ega kaj **eta** estas t.n. *diafanaj* sufiksoj: ili ne ŝanĝas la gramatikan karakteron kaj sencon de la radikoj, nur modifas iom la lastan. En iliaj derivaĵoj ili estas analizeblaj adjektive (ĉe substantivoj), aŭ adverbe (ĉe adjektivoj kaj verboj): *dometo*: eta domo; *grandega*: ege granda; *parolaĉi*: aĉe paroli.
 Um estas tute senregula en siaj derivaĵoj, kiujn oni devas aparte lerni.

AĈA

- 410** **Aĉa**, oficialigita de la Lingva Komitato en 1909, donas al la vorto nuancon de malŝato, malestimo.
 Ekzemple: *domaĉo, ĉevalaĉo, hundaĉo, libraĉo, frazaĉo, verkaĉo, vestaĉo, herbaĉo; dikaĉa, molaĉa, fieraĉa; parolaĉi, iraci, verkaĉi, revaĉi* ktp. Vd. fi- (§ 426) kaj mis- (§ 368).
 Rim. La aĉ-kunmetoj ĉiam impresas kiel esprimoj de individua juĝo. Kiam temas pri objektiva konstato, pli bone estas uzi apartan vorton (kabano), aŭ *mis*-kunmeton (mispaŝo, miskompreni).
M e m s t a r e: *aĉa* signifas: senvalora, maltaŭga, malŝatinda.
P l u f o r m a d o: *aĉaĵo, aĉaĵaro* (*fatraso); *aĉulo, aĉigi*.

EGA

- 411** **Ega** estas analoga al **eta**, sed kun signifo mala: ĝi pligrandigas, plifortigas.
 Ekzemploj: *domego, urbego, ventego, pluvego; bonega, grandega, altega, rapidega, necesega; korege, treege; kriegi, spiregi, falegi, manĝegi, petegi, ĝojegi, ridegi*.
 Ankaŭ **eg** ofte formas vortojn kun speciala senco, al kiuj en la naciaj lingvoj respondas apartaj radikvortoj. Parto de tiaj *eg*-kunmetoj estas anstataŭigita per radikoj ankaŭ en E-o. Ekzemple: *ungego* (*krifo, ungo de rabbestoj), *buŝego* (*muzelo, buŝonazo de bestoj), *kortego* (reĝa korto), *grandega* (*enorma), *brulego* (*incendio), *superakvego* (inundo, diluvo), *ŝtonego* (roko), *kuraĝega* (aŭdaca), *pordego* (pordo

de korto aŭ urbo), *ŝnurego* (ŝnuro de ŝipo, kablo) ktp.

Rim. Per *eg* oni esprimas kelkfoje ankaŭ nuancon de malŝato: *buŝego*, *piedego*, *ungego* (de bestoj); *manĝegi*. Malaprobis tion oni ne povas, ĉar tio paralelas kun la karesa nuanco de *eta*. Sed ĝuste pro tio, oni ne nomu plenkreskulon karesse *knabego*; oni diru simple *k n a b o*: *nu*, *maljuna knabo*, *kiel vi fartas?*

M e m s t a r e: *ega* (pli forta esprimo ol *granda*).

ETA

412

Eta signifas: *malgranda*. Ĝi malpliigas, malfortigas la tutan koncepton de la vorto. Ĝi, same kiel *aĉa*, povas ligiĝi al ĉiakarakteraj radikoj.

Ekzemploj: *dometo*, *pardeto*, *ĉambreto*; *diketa*, *beleta*; *dormeti*, *brueti*, *manĝeti*, *ploreti*. Post la nomoj de koloroj ĝi signas koloron duban, nuancon: *verdeta*, *blueta*, *ruĝeta*.

Ofte ĝi servas ankaŭ por specialigo de ideo. Por kelkaj tiaj et-kunmetoj estas proponataj novaj radikoj. Ekzemple: *ŝtoneto*, *monteto*, *ŝtupeto*, *vojeto* (*pado), *varmeta* (*tepida), *faleti* (*stumbli), *ŝnureto* (*spago), *arbeto* (arbusto, arbedo), *rideti*, *krieti* (krii per tre alta, tranĉa voĉo: *ŝriki), *ŝtrumpeto* (duonŝtrumpo), *cerbeto* (cerebelo), *rafaneto*.

M e m s t a r e: *eta* (malgranda, plejofte *gracie* malgranda).

P l u f o r m a d o: *etulo*, *etulino*; *etaĵo*; *etigi*.

Rim. Per *et* oni esprimas kelkfoje ankaŭ karesemon: *Paŭleto*, *patreto*, *patrineto*. Vd. *ĉj*, *nj*.

UM

413

Um ne havas difinitan sencon. Ĝi povas ligiĝi al ĉia radiko, kaj povas havi ĉian karakteron; ekzemple: en *buŝumo* (umo de buŝo) ĝi estas substantiva sufikso, en *proksimuma* (uma je proksimo) adjektiva, en *foliumi* (umi per folio) verba.

Kvankam ĝi ne havas difinitan sencon, oni povas klasi la vortojn per ĝi formitajn en diversajn grupojn, en kiuj ĝia senco estas proksimume la sama.

1. Ĝi povas signifi: *agi iel per...*, aŭ *agi kiel...* Ekzemple: *foliumi* (turni la foliojn de libro), *palpebrumi* (rapide fermi kaj malfermi la palpebrojn por ripozigi la okulojn aŭ por signi al iu), *okulumi* (rigardi avide aŭ kokete), *cerbumi* (pene streĉi la menson, "rompi al si la kapon"), *lotumi* (priloti), *brakumi* (ĉirkaŭpreni per la brakoj), *kolombumi* (voĉi kiel kolombo), *saĝumi* (ankaŭ: *saĝisti*: filozofi [kun iom da aĉnuanco]), *spikumi* (kolekti spikojn post rikolto), *mastrumi* (gvidi kiel mastro), *frenezumi* (agi kiel freneza), *butonumi* (fiksi la butonon en la butontruo).

Rim. I. En la fruaj tempoj de la lingvo oftaj estis la ĉi-sencaj um-kunmetoj; ekzemple: *kronumi*, *martelumi*, *brosumi*. Nun oni uzas simple la i-finaĵon: *kroni*, *marteli*, *brosi*; la sufikso restas maksimume, ĉe la pluformado per *igi*, por signi la agan elementon (*martelumigi*, *brosumigi*, *kronumigi*). Ankaŭ kelkaj el la supre

cititaj vortoj povas perdi la sufikson; ekzemple: *folii, palpebri, okuli, cerbegi, braki, mastri, frenezi, butoni*. Tamen, ĉe ili la umaj formoj jam forte ekradikis. Por *kolombumi* oni nun uzas *kveri*.

2. Umi povas signifi: provizi per...; ekzemple: *aerumi* (provizi ĉambron per freŝa aero), *akvumi* (priverŝi per akvo), *popolumi* (provizi per homoj, plenigi per popolo), *arbarumi* (plenkreskigi per arboj), *ferumi* (surforĝi hufferon), *fumumi* (igi konservata per fumo), *ombrumi* (provizi per ombrantaj streketoj bildon), *sapumi* (ŝmiri per sapo), *sukerumi* (provizi per sukero ekz-e kafon), *ŝnurumi* (kunligi, fermi ŝuon per ŝnuro), *ventumi* (provizi per frape estigita vent[et]o), *sunumi* (elmeti al la radioj de la suno). Parenca signifo: provizi iun per nomo: *nomumi* (doni la nomon, levante en rangon, staton: nomumi iun instruisto); *friponumi* (nomi iun fripono), *azenumi* (nomi iun azeno). (Kp. *iz*, § 360).

Rim. II. Ankaŭ kelkaj el tiuj ĉi formoj estas fareblaj simple per la i-finaĵo; ekzemple: *akvi, popoli, sapi, ŝnuri, sukeroi*. Tute perdiĝis **um** el la fruaj formoj: *orumi* (ori aŭ orizi), *kuprumi* (kupri aŭ kuprizi), *arĝentumi* (arĝenti aŭ arĝentizi). Maksimume ĉe la pluformado estus konservata la sufikso **um** (prefere: *iz*); ekzemple: *orumigi* (orizigi), *kuprumigi* (kuprizigi), *kuprumisto* (aŭ kuprizisto aŭ kupradisto).

3. Karl Minor proponis la sufikson **um** por rilatigi verbon transitive ne al ĝia kutima rekta komplemento, sed al la objekto aŭ persono, kiun la ago koncernas. Ekzemple: *verŝumi* kampon (verŝi akvon), *tondumi* kapon (tondi harojn), ktp. Tiu propono ne trovis imitantojn; oni uzas ĉi-sence, laŭ la zamenhofa ekzemplo, la prefikson **pri-** (*priverŝi, pri-tondi* ktp. Vd. § 399).

4. -Umo povas signifi: kio ĉirkaŭprenas, kovras, vestas; ekzemple: *buŝumo* (kovraĵo sur buŝo de hundo), *kalkanumo* (subkalkana ledsubmetaĵo de ŝuo), *kolumo* (ĉirkaŭkola tolaĵo), *nazumo* (surnaze fiksitaj okulvitroj), *plandumo* (plando de ŝuo), *manumo* (tolaĵo, puntaĵo ĉirkaŭ la manradiko, aŭ la malsupra ekstremaĵo de maniko), *pakumo* (kovraĵo de pak[aj]o). Samsence, sed laŭ analizo M. (... el ...), estas uzeblaj: *orumo* (maldika surfaca ortavolo), *arĝentumo, kuprumo, nikelumo* ktp.

5. Per **-um** oni povas signi *id e o n* iel devenigeblan el la radiko, sed esprimeblan per neniu el la ceteraj sufiksoj. Ekzemple: *alfabetumo* (alfabetlibro), *amindumi* (klopodi por esti aminda al iu), *brulumo* (inflamo), *ĉarumo* (puŝĉareto), *domaĝumi* (kaŭzi domaĝon, damaĝi), *edzumo* (geedzeco, geedza vivo), *flankumi* (1. gapadi ĉe ies flanko; 2. deflanke ŝtele aliri; 3. deflanke ataki, pafi), *gustumi* (provi la guston de io), *komunumo* (malgranda administra distrikto), *kortumo* (supera juĝistaro), *laktumo* (fiŝlakto), *linoleumo* (tëksaĵo trasorbigita per linoleo), *malvarmumi* (malsaniĝi de malvarmo), *mondumo* (la elita mondo), *partumo* (frakcio), *pasumi* (pasadi gape, nenifare), *plenumi* (efektivigi laŭ ordono aŭ devo), *proksimume* (ĉirkaŭe), *provizumi* (provianta), *rektumo* (rekta dika intesto), *respondumi*

(prirespondi, respondi), *rulumi* (fari cigaredon per tabakpaper-rulado), *sentumo* (senso), **vicumi* (anstataŭi).

6. Laŭ la Zamenhofa *krucumi* (ekzekuti per kruco) kaj laŭ la Kabea *palisumi* (mortigi traborante la korpon per paliso) oni proponis esprimi per um-kunmetoj la diversajn *s p e c o j n d e e k z e k u t o*. Ekzemple: *kvaronumi* (tranĉi en kvar partojn), *hakilumi* (mortigi per hakilo), *radumi* (mortigi sur rado), *pendumi* (ekzekuti per pendigo), *dekumi* (ekzekuti ĉiun dekan homon el trupo), *ŝtiparumi* (bruligi sur ŝtiparo), *ŝtonumi* (mortigi per ŝtonoj). Tio ŝajnas tre bona solvo.

Umo aŭ *umi* ne estas *m e m s t a r e* uzata, pro ĝia nedifinita senco. Sed oni povas ĝin uzi, kiam, pro distreco, ne venas en la kapon la bezonata vorto. Ekzemple: *donu al mi tiun umon; oni devas umi tiun aparaton* (Sturmer).

IFI

Ifi estas nove proponata sufikso kun la nura senco: *igi -o* (oigi). Ĝi estus uzata nur ĉe adjektivradikaj substantivoj, por diferencigi de *igi -a*.

Ekzemple: *varmifi* (igi varmo), *acidifi* (igi acido), *elektrifi* (igi elektro).

Ĝi povus ligiĝi ankaŭ kun **iĝi**: *varmifiĝi, acidifiĝi, elektrifiĝi*.

Pri ĝia neceseco vd. § 435.

414

ĈJO, NJO

Per *-ĉjo* (vira) kaj *-njo* (virina) oni formas karesajn nomojn. Laŭ la Fundamento kaj la *Z-a* uzado, ili gluiĝas post unu el la unuaj kvin literoj de respektive vira aŭ virina antaŭnomo.

Ekzemple: *Peĉjo* (Petreto), *Paŭĉjo* (Paŭleto), *Vilĉjo* (Vilhelmeto), *Joĉjo* (Jozefeto, Johaneto).

Manjo (eta Maria aŭ Margareta), *Sonjo* (Sofia), *Elinjo* (Elizabeta), *Anjo* (Anna), *Henjo* (Henrika), *Lunjo* (Luiza).

Ĝi estis poste uzata ankaŭ kun la nomo de familianoj. Ekzemple: *paĉjo* kaj *panjo* (patro kaj patrino), *fraĉjo* kaj *franjo* (frato kaj fratino), *oĉjo* kaj *onjo* (onklo kaj onklino), *fiĉjo* kaj *finjo* (filo kaj filino). Oni renkontas ankoraŭ: *amiĉjo* kaj *aminjo* (amiko kaj amikino). Oni povus formi: *knaĉjo* kaj *knanjo*, *amaĉjo* kaj *amanjo*, *infaĉjo* kaj *infanjo* ktp., sed tiuj ĉi formoj apenaŭ estas uzataj. Ĝenerale tiuj ĉi du sufiksoj estas iom neglektataj, kaj en tradukoj oni plej ofte uzas la diversajn *naciajn* karesformojn de nomoj: *Johnny, Dick, Gretchen, Saŝa* ktp. R. Rossetti uzis *njo-knabo*, por signi la favoraton de perversa reĝo (F. *un mignon*).

Rim. La kaŭzo de la malprospero de tiuj du sufiksoj ŝajne estas ilia nenormala fonetika konsisto: ili estas la solaj esperantaj sufiksoj, kiuj komenciĝas per konsonanto. Eble oni povus plifaciligi ilian uzon, adaptante ilin al la respondaj seks-sufiksoj *-ul-* kaj *-in-*: oni disponus tiel la formojn *-uĉjo* kaj *-injo*, kiuj ebligus pli rekoneblajn nomojn: *Petruĉjo, knabinjo* ktp.

415

VERAJ PREFIKSOJ

Difino

- 416** Veraj prefiksoj estas **bo, eks, ge, mal, pra** kaj (neoficiala) **pseŭdo**. Ili diferencas de la prefiksoidoj per tio, ke ili ne funkcias kiel radikoj, laŭ la reguloj de vortkunmeto. Ili gluiĝas antaŭ la radikon kvazaŭ nedisigeble, formante kun ĝi *novan radikon*. Aliparte, ili similas al la radikoj per tio, ke ili povas esti uzeblaj memstare kun finaĵo (*mala, praa, eksa*), kvankam ĉe kelkaj (*boa, gea*) tio okazas tre malofte. Tia funkcio ne estas ekskluziva al la proprasencaj veraj prefiksoj. La saman funkcion oni povas trovi, kvankam relative malofte, ĉe prefiksoidoj, radikoj, prepozicioj. Tion oni povas nomi *prefiksiĝo*. En la sekvantaj linioj ni pritraktos unue la verajn prefiksojn, poste la prefiksiĝinte funkciajn aliajn elementojn.

BO

- 417** **Bo-** signifas parencecon estiĝintan per propra aŭ nepropra edziĝo aŭ edziniĝo. Ĉiuj parencoj de la edzo iĝas samgradaj boparencoj de la edzino kaj reciproke; la edzo iĝas samgrada boparenco al la parencoj de la edzino kaj reciproke. Escepto estas la infanoj devenintaj el antaŭa geedzeco de iu el la geedzoj; ties oni signas per la prefikso **duon-** (vd. § 425).

Ekzemploj: *bofrato*: frato de la edzo por la edzino, frato de la edzino por la edzo, edzo de virino por ŝiaj gefratoj, edzo por la edzo de la fratino de sia edzino. *Bofilo*: edzo de filino. *Bonevo*: edzo de nevino, aŭ nevo de la edzo, aŭ nevo de la edzino. *Bokuzo*: edzo de kuzino, aŭ kuzo de la edzo, aŭ kuzo de la edzino. Same: *bofratino, bopatrino, bofilino, bonevino, bokuzino*. La formoj *bonevo, bokuzo* apenaŭ uziĝas, oni diras simple *nevo, kuzo* aŭ *boparenco*. Same oni ne distingas la boecon de la *geonkloj*.

Bo antaŭiras al **ge**: *bogepatroj, bogefratoj, bogefiloj*.

Krom la supraj vortoj, **bo-** estas uzata nur en la vorto *boparenco*, kaj en la (zamenhofa) *boedziĝi*: edziĝi al la edzino de la mortinta frato, kaj en la ŝerca formo: *boamiko*.

M e m s t a r e: **bo-** apenaŭ estas uzata. Sed oni povus diri: veni en *boan* rilaton; *boeco* (boparenceco), *boulo* (boparenco).

EKS

418

Eks- signifas: iama, ne plu funkcia, abdikinta. Ĝi ligiĝas preskaŭ ekskluzive al vortoj signifantaj profesion. Ekzemple: *eksreĝo* (detronigita aŭ abdikinta reĝo), *eksministro*, *eksoficisto*, *eksoficiro*, *eksurĉestro*, *eksprezidanto*, *eksinstruisto*.

Eksedzo: edzo leĝe disigita je l' edzino; *eksedzino*. *Eksedziĝi*, *eksedziniĝi*. *Eksedziĝ-proceso*.

M e m s t a r e: *eksa*: iama, ne plu funkcia, abdikinta. *Eksiĝi*: abdiki (de posteno), eligi (el klubo); *eksigi*: abdikigi, eligi; *eksmoda*: (eksa modo)-a: elmodiĝinta.

Rim. I. D-ro Sós uzis la (imitandan) familiaran esprimon: "*eks pri li*" (estas finite pri li).

Rim. II. Oni povus uzi *eks*, *eks!* aŭ *eksu!* ankaŭ kiel la malon de *vivu!* (*Eksui* estus la malo de *vivui*).

GE

419

La signifo de **ge-** estas: ambaŭ seksoj. Ĝi signas:

1. **P a r o n.** Ekzemple: *geonkloj*, *gepatroj*, *gesinjoroj* (sinjoro kaj lia edzino: *gesinjoroj Bartel*), *geedzoj*, *geamantoj*, *gekolomboj*.

2. **S a m g r a d a j n p a r e n c o j n e l a m b a ŭ s e k s o j:** *gefratoj* (ĉiuj fratoj kaj fratinoj de la sama familio), *gefiloj*, *geinfanoj*, *genepoj*, *geavoj* (ambaŭ avo-paroj).

3. **L a t u t a n f a m i l i o n:** *getajloroj* (tajloro, tajloredezino kaj iliaj gefiloj). Ĉe personaj nomoj oni diras *familio*; ekzemple: *la familio Monti*.

4. **Ĝenerale:** a m b a ŭ s e k s o j n. Ekzemple: *geknaboj*, *gelernantoj*, *gesinjoroj*, *gesamideanoj*.

Rim. I. La tro ofta uzo de **ge** en la lasta senco ne ŝajnas imitinda. Oni povas diri simple *samideanoj*, kaj, ĉe alparolo, estas pli elegante: *sinjorinoj kaj sinjoroj*. Anstataŭ *gelernantoj*, *gekursanoj* tute sufiĉas: *lernantoj*, *kursanoj*. Ankaŭ ĉe bestonomoj estas nenecesa la prefikso. Sufiĉas: *bovoj*, *ĉevaloj*. *Gekolomboj* nur, se temas pri *paro*.

Rim. II. Oni povus uzi **ge-** ankaŭ ĉe verbaj radikoj. Ekzemple: *gevido* (geedzeco); *gebanado* (kuna banado de viroj kaj virinoj); *geedukado* (kuna edukado de knaboj kaj knabinoj). *Gesolaj* (Cseh): pare en soleco.

M e m s t a r e: *geo* (paro), *geiĝi* (pariĝi), *geigi* (parigi), *gea vivo* (para vivo). Malofte uzataj formoj.

Vd. ankoraŭ § 33.

MAL

420

Mal- signas la rektan kontraŭon de la ideo esprimita de la radiko, antaŭ kiu ĝi staras.

Ekzemploj: *malvarma*, *malbela*, *malalta*, *mallaŭta*; *malhonori*, *malami*, *malsukcesi*, *malprosperi*; *malamiko*, *malhomo*²; *malsupre*, *malantaŭ*,

malpli.

Dum aplikite al verbaj radikoj **mal-** signas plej ofte rektan kontraŭon, bone distingindan de la simpla *neo*, ĉe adjektivaj radikoj tiu distingo ne estas tiel akra ĝenerale. Escepte de kelkaj adjektivoj, kiuj esprimas kvazaŭ agon (utila-malutila), la mal-kunmeto estas nur *pli insista neo*. *Mal-agrabla* estas nur pli forte emfazita *neagrabla*, kaj same: *glata-neglata-malglata, forta-neforta-malforta, afabla-neafabla-malafabla*. Ĉe la adjektivoj do ekzistas nenia malpermeso pri la uzo de **mal**; por pli emfazi la vortojn *neĝusta, necerta*, oni povas uzi tute bone: *malĝusta, malcerta*, kvankam ili diras la samon kiel la neaj formoj. Cetere tio validas ankaŭ pri kelkaj verboj. *Malami, malhonori, malŝlosi, mallauĉi, malkovri* estas tute ne identaj kun *ne ami, ne honori, ne lauĉi, ne ŝlosi, ne kovri*, sed ekzemple *malsukcesi* kaj *malprosperi* estas nur pli emfazaj *ne sukcesi* kaj *ne prosperi*.

Rim. I. La vorto *malhavi* signifas la kontraŭon de *havi*. Do ne nur simplan nehavon, sed *pozitivan mankon*, la *senton* de manko. Ekzemple: "*mi ne havas tiun libron*" (tiu libro ne estas en mia posedo); "*mi malhavas tiun libron*" (mi sentas la mankon de tiu libro, mi ne havas ĝin, kvankam mi bezonas). *Maldormi* estas ne nur *ne dormi*, sed ne dormi en tempo kutima de dormo.

Rim. II. Oni evitu mal-kunmeton de radikoj, kiuj estas tre "penetremaj". Ekzemple oni ne diru: *malabomeni* (ŝategi), *malgiganta* (pigmea, nana), *malkolosa* (liliputa, miniatura), *malenvii* (konsenti por, koncedi por), *malŝuldo* (bonhavo). *Malsufiĉega* estas vorto pli plaĉa ol *malabunda*.

La prefikso **mal** estas ekstreme utila kaj tial oftege uzata prefikso. Sendube ĝi multege helpas por igi facila la lingvon, ŝparante multajn radikvortojn. Sed tiu tro granda rolo de **mal** havas ankaŭ siajn malavantaĝojn.

1. kelkfoje ĝi donas tro longajn vortojn (malrapida, maldiligenta, malpermesi ktp.).

2. ofte ĝi neeviteble amasiĝas en frazoj, donante monotonan efekton.

Unu ekzemplo, inter kelkaj: "*Ho malfeliĉa estaĵo! – diris la maljuna poeto kaj levigis, por malfermi la pordon. Tie staris malgranda knabo; li estis tute malseka, kaj la akvo fluis el liaj longaj blondaj haroj. Li tremis de malvarmo; se li ne estus enirinta, li certe pereus en la malbona vetero*" (Zamenhof, *Fabeloj de Andersen*, I. pĝ. 33; vidu same II. pĝ. 115: 5 **mal** en tri linioj kaj entute 24 en la 24 linioj de la tuta fabelo; aŭ Marta, pĝ. 11: 8 **mal** en kvin linioj ktp.).

3. ĝi ofte neeviteble rompas la akcentregulon. Antaŭ akcenta vokalo, nome, **mal** estas en tiel "ombrata" loko, ke tio ne respondas al ĝia signifeco, kiam la vorto estas speciale emfazata. Tiam do oni nehelveble akcentas ĝin, farante vortojn "daktilajn", sekve fremdajn al Esperanto. Ekz-e: "*Ĉu vi volas kafon varman aŭ malvarman? – Mi petas, malvarman!*"

4. **mal**-vorto ne povas havi tian esprimvaloron kiel radikvorto. Malnova esp-isto diros eble, ke *malbela* aŭ *maldiligenta* estas por li fortesprimaj vortoj. Sed certe, se li nur iom alkutimiĝos al *turpa* kaj *pigra*, li sentos, ke apud ĉi tiuj la mal-vortoj estas pli klarigaj ol esprimaj. La ĝenerala, senescepta utiligo de **mal**-certe estas ia Basic-elemento en nia lingvo. Tion sentis ankaŭ Zamenhof mem (vd. ĉi sube).

En la komuna lingvo, la menciitaj malavantaĝoj ordinare ne estas gravaj*, sed tiom pli en la poezio. Tie aldoniĝas krome ankaŭ la neceso de la rimvortoj (kiujn mal-evidente malpliigas), kaj la longeco de la mal-vortoj (minimume tri silaboj). La enkonduko de radik-ekvivalentoj, siavice, havas tiun avantaĝon, ke ili prezentas esprimojn paralelajn, t.e. sinonimojn, kaj la riĉo je sinonimoj estas unu el la post-lajaj kiel de la poezio, tiel de la arta prozo.

Pro tiaj konsideroj jam Zamenhof mem komencis uzi iom post iom ne-fundamentajn radikvortojn anstataŭ mal-vortoj, se ne paroli pri tio, ke ankaŭ en la Fundamenta Universala Vortaro jam ekzistas *fini* (malkomenci), *forgesi* (malmemori), *manki* (malesti), *morgaŭ* (malhieraŭ), *morto* (malvivo) ktp. tiel same rajtaj aŭ nerajtaj principe, kiel la de-tiamaj anstataŭaĵoj de mal-vortoj.

Tiaj zamenhofaj "neologismoj" estas: *absolvi* (malkondamni), *absurda* (malracia), *amara* (maldolĉa), *aflikti* (malĝojigi), *efemera* (maldaŭra), *falsa* (malvera), *fiaski* (malsukcesi), *fiktiva* (malreala), *kvereli* (malpaci), *milda* (malsovaĝa), *pasiva* (malaktiva), *perversa* (malvirtema), *stulta* (malsprita), *striktaj* (malvasta), *ŝrumpi* (malŝveli) ktp.

Sekvante la Z-an ekzemplon, Grabowski ekuzis: *aperti* (malfermi), *disipi* (malŝpari), *ekskuzi* (malakuzi), *eta* (malgranda), *humida* (malseka), *neglekti* (malzorgi, malatenti), *noci* (malutili), *obstaklo* (malhelpaĵo), *rara* (malofta, maldensa). El aliaj aŭtoroj Grosjean-Maupin kolektis: *aspra* (malglata), *aŭstera* (malkaresema), *cis* (maltrans), *dura* (malmola), *skoldi* (mallaŭdi), *sordida* (malpura), *stupida* (malsaĝega); aliaj vortaristoj same: *aŭdaca* (maltima), *despero* (malespero), *lasciva* (malĉasta), *morna* (preme malhela), *obskura* (malluma), *trista* (malgaja).

Tiuj vortoj grandparte fariĝis komunuzaj, parte eĉ oficialaj: oni do povas diri, ke la monopolo de mal- estas jam delonge ĉesigita. Malprave estas sekve, se oni akuzas per "rompo de la Fundamento" aŭ per kontraŭzamenhofeco tiun, kiu uzas paralelan radikvorton por iu ĝena mal-kunmeto. Tiel, konfesinde, ne regas plu la principo de "unu ideo – unu vorto", sed aŭskultu nur pri tio la vortojn de Th. Cart, kiu estis eble la plej severa gardanto de la "fideleco". Li skribas: "... multaj vortoj por la sama ideo, se nur ĉiuj estas facile kompreneblaj, absolute ne estas danĝero, sed kontraŭe riĉeco: 'unu vorto, unu ideo; unu ideo, unu vorto' estas alloganta formulo, sed praktike 'logika' eraro sen ia reala signifo: ĉiu lingvo baldaŭ mortus de tia severa logikeco".**

Jen sekvas, kun kelka ŝanĝo kaj aldono, listo de malvort-anstataŭaĵoj, kiujn en la dua eldono ni prezentis post la tralaboro de la tuta E-a radikaro. Oni povos konstati, ke ili estas malpli multaj, ol la similaj vortoj aperintaj antaŭ nia interveno (la z-markitaj venas el la neologisma projekto de Z.):

malafabla (*moroza*), malalta (*basa*), malami (*hati*), malbela (*turpa*), malbona (*mava*^Z, *misa*), maldekstra (*liva*), maldika (*minca*), maldiligenta (*pigra*^Z), maldormi (*vigili*), malfirma, malstreĉa (*loza*), malforta (*febla*), malfrua (*tarda*), malgracia

* Tamen, ili povas kaŭzi eĉ akcidenton per la miskompreno de komandoj, kiel: "Turnu (mal)dekstren!", "Tiru (mal)supren!", kriataj el malproksimo aŭ en bruo: atestanto pri tiel kaŭzita akcidento estis E. Malmgren.

**El la Antaŭparolo al la libro de P. Boulet *Du mil novaj vortoj ĉerpitaj el la verkaro de L. L. Zamenhof*, 1908. Vd. ankaŭ: Waringhien, *Lingvo kaj Vivo*, pĝ. 244-256.

(*plumpa*), malgranda (*pita*), malgrasa (*magra*), malhela (*sombra*), malhelpi (*impedi* kaj *preventi*), malhumilo (*orgojlo*), maljuna (*olda*), malkuraĝa (*poltrona*), mallarĝa (*streta*), malkonkordo (*diskordo*), mallaŭta (*softa*), mallonga (*brev^z*, *kurta*), mallumo (*tenebro*), malpermesi (*prohibi*), malplena (*vaka*), malpli (*men^z*), malmulta (*poka*), malpreciza, malcerta (*svaga*), malproksima (*dist^a*, *lontana*), malrapida (*lanta*), malriĉa, kompatinda (*povra*), malsupre (*infre*), malsupren (*sob^z*), malvarma (*frida*).

Dum multaj el ĉi tiuj vortoj fariĝis uzataj en la literaturo kaj estis registritaj en vortaroj, aliaj ne trovis aplikantojn (kelkajn tiajn ni ellasis aŭ ŝanĝis en ĉi tiu kvara eldono). Kaj tiel estas ĝuste: pri ĉiu novismo devas ja decidi la uzado.

Pri la ne-uzo de **mal-** antaŭ substantivoj de konkreta senco kaj ĝia anstataŭigo per **ne-**, vd. § 428.

Male, antaŭ adjektivoj oni uzas plej ofte **mal-** (maltaŭga, malforta, malkorekta, malkonvena, malkonforma), aŭ **sen-** (sentaŭga, senforta, senutila, sencerta). Kiam la sencoj estas la samaj (maltaŭga-sentaŭga, malcerta-sencerta), la mal-formo ŝajnas pli forta, pli emfaza esprimo. Ĉe kelkaj vortoj ekzistas evidenta diferenco; ekzemple: *senutila* havas tute alian signifon ol *malutila*. *Senespera* estas, kiu ne havas esperojn, *malespera* estas, kiu jam eĉ ne volas, kiu jam rezignis havi esperojn. *Malforta* signas plie naturdevenan, esencan, *senforta* pli momentan mankon de forto.

M e m s t a r e: oni uzas: *mala* (kontraŭa), *male* (kontraŭe), *malo* (kontraŭo).

PRA

421 La prefikso **pra-** signas:

1. La **sekvan**tan, supreniran aŭ malsupreniran, **gradon** de **paren**co. Ekzemple: *praavo* (patro de avo), *pranepo* (filo de nepo), *prapraavo* (avo de avo), *prapranepo* (nepo de nepo). *Praonklo* estas patro de onklo. Same: *praavino*, *pranepino*, *praonklino*. Ĉar por signi *patron de patro* kaj *filon de filo* oni havas la vortojn *avo* kaj *nepo*, *prapatro* kaj *prafililo* neniam estas ĉi-sence uzataj. *Prapatro* estas *patro antaŭ multaj generacioj*, kutime la fondinto de la familio. Liaj malproksimaj devenuloj estas liaj *prafililoj*. *Prapatroj*: plej malproksimaj antaŭuloj.

2. Ion **primitiv**an, (de)-**antaŭlong**an, malproksime **antaŭ**temp^an: ekzemple: *praarbo*, *prahejmo*, *pratipo*, *prahomaro*, *prahomo*, *prahistorio*, *prabesto*, *pralacerto*, *prabirdo*, *pratempo*, *prakaŭzo*, *prageneracio*, *praĉelo*.

M e m s t a r e: *praa*, *praeco*, *praulo* (malproksima antaŭulo); *prae* (pratempe).

PSEŬDO**422**

Neoficiala sed zamenhofa prefikso kun la senco: falsa, malvera. Ekzemploj: *pseŭdoargumento*, *pseŭdoscienco*, *pseŭdopatriotismo*, *pseŭdosentimentala*, *pseŭdosufikso*, *pseŭdopompo*. Memstare apenaŭ uzata (*pseŭdaj argumentoj?*).

PREFIKSIĜO DE RADIKOJ

423

Pri radik-prefiksiĝo temas, kiam la vortkunmeto ne obeas la vortefikajn regulojn: oni povas ĝin klarigi nek per unua-, nek per duagrada analizo, nek per inversa vortefiko, sed oni venas plej proksimen al ĝia senco, analizante ĝin per adjektiva flankelemento: *etburĝo* = eta burĝo, *dikfingro* = dika fingro. Kiel ni vidis, tio estas neregula, do tiaj vortoj propre estas fremdaj al la Esperanta vortsistemo.

Kiel ili aperis tamen en Esperanto? Nu, ili havas plurajn fontojn.

1. Oni povas trovi ilian originon en kelkaj prefiksoj grekdevenaj (*eŭ-*, *kako-*, *pseŭdo-*, *neo-*, *iso-*). Oni estis tentata traduki ĉi tiujn per E-aj elementoj (*bon-*, *malbon-*, *fals-*, *nov-*, *sam-*); unu el ili eĉ elluktis por si apartan formon prefiksitan (*mis-*).

2. Ilia speciala fonto estis la germana lingvo, ofte uzanta kunmetojn adjektivo-substantivajn; ĉi tiujn germanaj vortaristoj (Jürgensen, Christaller, Minor, Loy, Bennemann) simple imitis en siaj vortaroj. Ne malgranda parto de tiaj kunmetoj, cetere, estas iel oblikve franc-origina: plurajn esprimojn, kiuj en la franca konsistas el du memstaraj vortoj, la germanoj, kaj post ili la slavlingvanoj transprenis kiel "vortojn fremdajn", kaj pro la ĉiama kunapartenado sentis tiujn vorto-duopojn kiel vortkunmetojn. Okazis, ke la esprimo estis tradukita en la germanan per vortkunmeto: tiel la franca *haut fourneau* fariĝis germane *Hochofen*, kaj E-e *altforno*. La vortaristoj, pro la memoro pri la "fremdvorto", kelkfoje estis eĉ pli germanaj ol la germana lingvo mem, kaj faris el *bonne humeur* la vorton *bonhumoro* (germane: *gute Laune*), el *bon goût* la vorton *bongusto* (germane *guter Geschmack*).

3. Esperanto uzas kelkfoje epitetitan substantivon por esprimi ion, kion ĉiuj lingvoj signas per radikvorto: estis do granda la tento tiaokaze kunfandi la epiteton kun ties substantivo por ricevi same unu vorton. Tiel estiĝis ekz-e *dikfingro* (A. *thumb*, F. *pouce*, G. *Daumen*, I. *pollice*, H. *pulgar*) aŭ *molanaso* (A. F. *eider*, G. *Eiderente*).

4. Kreiĝis tiaj vortoj ankaŭ en maniero, kiun oni povus nomi "retroformado". Ĉar la vortoj *bluokula*, *rapidpieda*, *fortemocia* estas regulaj (vd. § 303), oni kredis, ne sciante la E-an vortsistemon, ke *bluokulo*, *rapidpiedo*, *fortemocio* estas same regulaj kaj bonaj. Ĉi tie do temas pri simpla miskompreno, kiun kulpis eĉ vortaristoj: el la zamenhofa *bontona* Grosjean-Maupin, kaj post li E. Millidge ne hezitis tiri *bontono*.

5. Granda delogo fari tiajn kunmetojn estas la poezio, kie — por la bezono de ritmo aŭ por ŝparo de unu silabo — tiel bonvena ŝajnas kunfandi substantivon kaj epiteton adjektivan. Tiel naskiĝis ekz-e, en la Natantraduko de Minor, la fama *Kardio*, kiu ne signifas, kiel oni kredus unuavide, "enira aperturo de la stomako" (vd. Briquet, *Medicina Vortaro*), sed "*kara Dio*". Bedaŭrinde, ankaŭ Grabowski ne malofte sin helpis per tia poezia "*mallicenco*".

Zamenhof mem tre malmulte iniciatis tiajn kunmetojn (li skribis ekz-e *dika fingro*, *sovaĝa besto*, *fremda vorto*). Se tamen multaj tiaj vortkonstruaĵoj estas registritaj kiel zamenhofaj, ties kaŭzo estas, ke oni rigardas zamenhofa la materialon de la Jürgensen-vortaro, ĉar Zamenhof redakte ĝin kontrolis kaj per tio konfirmis ĝin, kaj ĉe tiu kontrolo, verŝajne sub la senpera influo de la germana lingvo, li estis pli liberala en la allaso de la adjektivaj flankelementoj ol en siaj propraj skribaĵoj. Propraskribe, kiel ni diris, iel instinkte li evitis ilin, ankaŭ en siaj poeziaj verkoj li kontraŭstaris la tenton: ŝpari silabon per kunfando. Tiel ke la nombro de neregulaj kunmetoj estas ne pli ol 16-18 en lia tuta ampleksa verkaro.

Esplorante la kunmetojn de tia speco, oni trovas, ke ilia senco ĉe parto de ili diferencas de la regula adjektiva formo: *junedzo* estas, ekz-e, ne juna edzo, sed viro ĵus fariĝinta edzo; *solinfano* estas ne sola infano, sed ununura infano de certaj gepatroj (*en la domo estas multaj solinfanoj*); *rapidvagonaro* ne estas nur rapida vagonaro (en kelkaj landoj ili estas eĉ malrapidaj), sed vagonaro haltanta nur ĉe certaj stacioj ktp. Oni povas diri, ke la prefiksiĝinta adjektivo montras ne individuan, sed kategorian, grupan, klasan kvaliton. Kaj ĉar povas okazi, ke la individua kvalito ne kongruas kun tiu kategoria kvalito, oni povas almeti al tiaj vortoj adjektivan epiteton, kiu montras la malon de la senco de la flankelemento: *maldika dikfingro*, *granda etfingro*, *maljuna junedzo*, *malsovaĝigita sovaĝbesto*, *malseka sekvinbero*. Kaj jen propre la vera pravigo de tiaj vortoj: se ili ne eltenas ĉi tiun provon, ili estas malbonaj, misformitaj, aŭ, maksimume, pli-malpli tolereblaj esceptoj.

Tiaj kelkaj neregulaĵoj en si mem, kiel esceptoj, signifus nenion malbonan, sed ili tamen enhavas danĝeron: oni ne konscias pri ilia escepteco kaj delogiĝas por ilia imitado. Ni do speciale kaj ree emfazas, ke tiaj formoj ĝenerale estas esceptaj kaj el ilia escepteco sekvas, ke ili ne pravigas analogajn formojn. Ekz-e *plenmano* ne pravigas la vorton *malplenmano* aŭ *plenĉambrego*, nek *dikfingro*, *rapidvagonaro*, *sekvinbero*, *novluno* pravigas la vortojn *diksinjorino*, *rapidĉevalo*, *sekvesto*, *novgasto* ktp. Kaj kompreneble, ili tute ne pravigas la principon, ke substantiva ĉefelemento povas postuli antaŭ si adjektivan flankelementon; la vortoj faritaj laŭ ĉi tiu principo do estas nelegitimaj, per ili oni propre kulpas maskitan elizion de la a-finaĵo. Tiaj eraraj kunmetoj estas ekz-e: *belknabino*, *bluokulo*, *diligentknabo*, *novnajbarino*, *fermitokuloj*, *ĝentilfraŭlino*. Ni devas insiste averti kontraŭ ili, ĉar ili en Esperanton

kontrabandas fremdan principon, kiu povas submini la bazon de la vort-sistemo. Abunde ni vidis ĝis nun, kiel la vortefikoj (precipe la substantiviga) regas en la vortfarado kaj dotas ĝin per firma spino kaj ekstrema elasteco. Se oni allasus ankaŭ alian vortefikon (adjektivigan), ĉio ĉi estus en danĝero, la tuta konstruaĵo ekŝanceliĝus, ĉio fariĝus malcerta kaj malfirma. Tiom certe ne valoras la ŝparo de kelkaj a-finajoj.

Ni ne deziras, tamen, ekstermi el la lingvo la pli-malpli familiariĝintajn kunmetojn de tia speco, nur teni ilin inter la kadroj de ilia escepteco. Ĉi-sube oni trovas plenan liston pri la pli-malpli akcepteblaj el ili, kaj inter ĉi tiuj senescepte ĉiujn zamenhofajn aŭ allasitajn de Zamenhof. Ni povas ilin dividi en tri grupojn:

I. Ĉe la plej multaj la respektiva adjektiv-prefikso troviĝas nur en unu sola aŭ en kelkaj kunmetoj. Ĉi tiujn ekzemplerojn aŭ pli-malpli longajn seriojn ni prezentas komplete kaj ni signas per cirkleto (○), ke la listo ne estas daŭrigebla.

II. En kelkaj serioj la adjektiv-prefikso estas uzata nur en pli strikta senco: ekz-e *sovaĝ-* (ne aldomigita), *krud-* (industrie ne prilaborita). Efektive, oni ne diras *sovaĝhundo* pri doma hundo sovaĝkonduta, sed nur pri hundo vivanta sovaĝeje; oni ne diras *krudfabo* aŭ *krudviando*, kvankam oni diras *krudmaterialo*. Tie ĉi lokiĝas ankaŭ la "geografiaj adjektivoj", kiuj povas prefiksigi nur antaŭ la nomo de lando aŭ kontinento (ekz-e *Mezameriko*), sed ne antaŭ aliaj substantivoj (oni ne diras: *orientlimo* aŭ *okcidentflanko*). Ĉi tiujn seriojn ni signas per "kaj similaj".

III. Fine ekzistas kelkaj radikprefiksoj, kiuj estas uzeblaj laŭ ĉiuj bezonoj; tiaj estas: **duon-**, **trion-** kaj la ceteraj frakciaj numeraloj, **fi-**, **fuŝ-**, **ne-** kaj **vic-**. Pro ilia pli larĝa uzebleco kaj ankaŭ, ĉar la senco de kelkaj el ili povas iom aliĝi ĉe la prefiksigo, ni apartigas ilin de la prefiksoj sub la du unuaj punktoj kaj pritraktas ilin en apartaj paragrafoj.

ADJEKTIVPREFIKSOJ

424

En la sekvanta paragrafo ni listigas la kunmetojn de la du unuaj punktoj. Ĉar, laŭ nia opinio, inter ili troviĝas ankaŭ pluraj superfluaĵoj, estiĝintaj el miskompreno aŭ kiel ekster-Francujaj francismoj, ni donas post ĉi tiuj parenteze la formon de ni konsilatan.

Jen estas do la listo de la prefiksigeblaj aŭ okaze prefiksigeblaj radikoj. Ni signas ankaŭ la zamenhofecon: la zamenhofan uzitecon per "z", troviĝon en la R.-E., E.-R. aŭ en la G.-E. aŭ E.-G. Vortaro de Zamenhof-Jürgensen-Pagnier per steleto: *.

ALI	: <i>alilando</i> ^Z (fremda lando). ○
ALT	: <i>altlernejo</i> ^Z (alta, supera lernejo aŭ ĉeflernejo); <i>altforno</i> *, (alta forno, fandforno); <i>altreliefo</i> *. ○
BEL	: <i>beletaĝo</i> ^Z (unua aŭ ĉefa etaĝo). ○
BON	: <i>bongusto</i> ^Z (bona gusto); <i>bonordo</i> ^Z (bona ordo); <i>bonstato</i> ^Z (bona stato). ○
DIK	: <i>dikfingro</i> (dika fingro ^Z , polekso). ○

- ET : *etbieno, etburgo, etfingro, etindustrio, etkomerco*. ○
- FALS : *falsvirto^Z* (falsa virto, pseŭdovirto, hipokrito). ○
- FREMD : *fremdlando^Z* (fremda lando); *fremdvorto* (fremda vorto^Z). ○
- GRAND : *grandduko, grandindustrio, grandkomerco, grandmajstro, grandsinjoro^Z, grandurbo, grandmogolo^Z*. ○
– Geografie: *Malgrand-Azio*. ○
- ĜENTIL : *ĝentilhomo* (nobelo, sinjora moŝto). ○
- JUN : *junedz(in)o, junlaboristo, junharingo*. ○
- KRUD : (metie ne prilaborita): *krudmaterialo, krudfero, krudledo* kaj similaj...
- KVAZAŬ : *kvazaŭhomo* (ĉifonfiguro); *kvazaŭrimo, kvazaŭsufikso* kaj similaj...
- LIBER : *liberbrigado* * (libera brigado, partizantrupo). ○
- MALBEL : *malbelformo* * (misformo). ○
- MALBON : *malbonhumoro* * (mishumoro); *malbonvetero^Z* (malbona vetero). ○
- MEZ : 1. Geografie: *Mezeŭropo, Mezameriko* kaj similaj...
2. Tempmezure: *mezepoko^Z, meznokto^Z* (noktomezo). ○
- MIS : *mismaniero, miskvalito, misgusto, mishumoro, misodoro*. ○
- MOL : *molanaso^Z* (somaterio). ○
- NORD : Geografie: *nordlando^Z, Nordameriko, Nordfrancujo* kaj similaj...
- NOV : Geografie: *Nov-Tero, Nov-Kaledonio, Nov-Jorko, Nov-Zelando* kaj similaj... Tempmezure: *novluno^Z, novmonato^Z* (monatnoviĝo). ○ Historie: *novkantismo, novplatonismo* kaj similaj...
- OKCIDENT : Geografie: *okcidentlando* *, *Okcident-Eŭropo, Okcident-Germanujo* kaj similaj...
- ORIENT : Geografie: *orientlando* *, *Orient-Azio, Orient-Afriko* kaj similaj...
- PLAT : *platboato* (plata boato, prameto); *platfiŝo* (plata fiŝo, pleŭronekto); *platglavo* (spado, flambergo); *platglobo* (mondkarto, mondmapo, globkarto); *platkuko* (biskvito); *platinazo* (plata, kuspita aŭ kata nazo); *platpano^Z* (maco); *platpiedo*; *platŝipo* (barĝo); *platŝtono* (ŝtonplato, slabo); *platvagono* (plata vagono); *platvergo* (liniilo). ○
- PLEN : *plenbarbo* * (plena barbo); *plenbuŝo* * (buŝpleno); *plenĉaro* * (ĉarpleno); *plenluno^Z* (plena luno); *plenmano* * (manpleno); *plentago* * (tagnokto, diurno). ○
- PRESKAŬ : *preskaŭrimo*. ○
- RAPID : *rapidvagonaro, rapidkuriero*. ○
- SAM : *samprezoz* * (prezegalo, alparo). ○

SANKT	: <i>sanktakvo</i> * (sankta akvo); <i>sanktfiguro</i> ^Z (sankta figuro); <i>sanktoleo</i> * (sankta oleo). ○
SEK	: <i>sekvino</i> , <i>sekvinbero</i> ^Z . ○
SOL	: <i>solinfano</i> ^Z , <i>solfilo</i> , <i>solfilino</i> . ○
SOVAĜ	: (ne aldormigita): <i>sovaĝbesto</i> , <i>sovaĝbirdo</i> , <i>sovaĝkato</i> , <i>sovaĝanaso</i> , <i>sovaĝpomo</i> , <i>sovaĝfloro</i> , <i>sovaĝrozo</i> kaj similaj...
SUD	: Geografie: <i>Suditalio</i> , <i>Sudafriko</i> kaj similaj...
VIRG	: <i>virgharino</i> * (junharino). ○

Rim. I. Plurfoje la adjektivsenco prefiksigo estas nur ŝajna: oni povas la vorton regule analizi. Ekz-e, laŭ VER. I. R. analizigas: *belartoj*^Z = artoj de (pri) belo; *favorprezo* = prezo de favoro; *kartempo** = tempo de kar(ec)o; *libertempo** = tempo de libero; *meznombro* = nombro de mezo (tial: *mezonombro*^Z); *mirlando*, *mirinfano* = lando, infano por miro; *rabbando*, *rabbesto*, *rabbirdo* = bando, besto, birdo (vivanta) per rabo (tial: *rabobirdo*^Z).

Pli komplikitan strukturon, analogan al *centjaro*, *trimasto* aŭ *dekkordo*^Z (instrumento de dek kordoj: vd. § 306) havas: *novjaro** = (nova jaro)-o = (tag)-o de nova jaro; *ruĝgorĝo** = (ruĝa gorĝo)-o = (bird)-o de ruĝa gorĝo.

Kompreneble la adjektivaj flankelementoj estas tute regulaj, kiam ĉeestas finaĵo proprafunkcia, kiu povas (Vd. § 303) kunkroĉi disfalajn flankelementojn: *bluokula* = (blua okulo)-a; *sanktolei* = (sankta oleo)-e-i ktp. Sed post la forigo de la proprafunkcia finaĵo tuj ĉesas tiu kuntena forto: tial *bluokulo*, ekz-e, estas malbona, kaj *sanktoleo* estas allasebla maksimume kiel escepto. Tiel same estas ĉe sufiksoidoj havantaj duoblan flankarakteron: *palvizaĝulo* sed *pala vizaĝo!*

Rim. II. Pri la tre multaj geografiaj nomoj, kies unua elemento estas 'sankta', estas konsilinde konservi al ili ilian nacilingvan formon kun ligstreko, kiel faris ordinare la "Poŝ-Atlaso": *Saint-Louis*, *San-Luis*, *São-Luis* ktp. Se temas pri fama nomo, kiun oni volas esperantigi, oni same uzu la ligstrekon: *Sankta-Helena* (insulo). G.W.

DUON-, TRION-, ktp.

425

Ĉiuj frakciaj numeraloj povas prefiksigi: *duonhora*, *trionparto*, *kvaronlitro*, *kvaronkilometro*, *milonmilimetro* ktp.

I. Speciale oni devas okupiĝi pri la prefikso **duon-**.

Ĝi signifas:

1. **Precize aŭ proksimume duonon**; ekzemple: *duonlitro*, *duonmetro*, *duonhora*, *duonvoje*, *duonplena*, *duontole* bindita, *duonluno*.

2. **Ne plene, ne komplete, preskaŭ**; ekzemple: *duonnuda*, *duonkovita*, *duonkuirita*, *duonbakita*, *duondormi*, *duonmallumo*, *duonlumo*, *duondio*, *duonvoĉe*, *duonfermita*, *duonkaŝi*, *duonoficiala*; *duonkrie* kaj *duonkante*; *duonnegro* (mulato); *duonsurda*.

3. **Rilaton de infanoj**, devenintaj el alia edzeco de patro aŭ de patrino, al la alia el la geedzoj, aŭ al ties infanoj kaj reciproke. Ek-

zemple: *duonpatro*: nova edzo de la patrino; *duonpatrino*: nova edzino de la patro; *duonfilo*: filo de la nova edzino aŭ de la nova edzo. *Duonfrato*: filo de la duonpatro aŭ duonpatrino.

II. El la nedifinaj numeraloj (§ 84), unu prezentas apartecon, kiun ni devas preparoli:

kelk, estante adjektivo same kiel **mult**, devas esti uzata nur kun finaĵo; sed Zamenhof, en la kunmetado kun la proprediritaj numeraloj, asimilis ĝin al tiuj, kaj donis al ĝi multiplikan valoron, kiam ĝin sekvas alia numeralo, kaj adician, kiam ĝin antaŭas: *kelkdek* = kelkaj dekoj (t.e. ekz-e inter 20 kaj 50), dum *dekkelke* = dek plus kelkaj (t.e. ekz-e inter 11 kaj 15). La du valoroj klare distingiĝas en jena Zamenhofs frazo: *Malantaŭ la pordo kondukanta al la salono bruis, babilis, ridis dekkelke, eble eĉ kelkdek homaj voĉoj*. Same, en plur-elementa kunmetaĵo: *la gracia, tridekkelkvara virino...* (t.e. aĝanta inter 31 kaj 35 jarojn).

Rim. I. Propre duonfrato signifas, ke inter la fratoj unu el la gepatroj estas komuna (sampaĵoj aŭ sampatrinaj duonfratoj). Oni devus rezervi la vorton *duonfrato* por tio ĉi, kaj tiujn duonfratojn, kiuj, deveninte el antaŭa edzeco de ĉiu el la gepatroj, havas komuna nek patron nek patrinon, oni devus nomi alie. Kaj ĉi tiun alian esprimmanieron oni devus apliki ankaŭ por *duonpatr(in)o* kaj *duonfil(in)o*, ĉar ankaŭ ĉe tiuj ĉi ekzistas nenia laŭsanga parenceco. Proponitaj estis vic- (vd. § 429) kaj stif-: *vicpatrino*, *stifinfano*, *stifa rilato*. Ĝis nun neniu el tiuj ĉi du proponoj renkontiĝis en la uzado – eble ĉar tiel teknikajn distingojn multaj naciaj lingvoj ne konas kaj la familia sento ignoras.

Rim. II. S-ro Couwenberg prave rimarkigis, ke pluraj nuntempaj verkistoj emas doni al la prefikse uzata **kelk** la senco de proksimumeco, kio kuntrenas konfuzon kun la Z-a uzado: *kelkmil* signifus zamenhofe 'kelkaj miloj', sed nov-uze 'iom pli aŭ malpli ol mil'. Por tion eviti, estus rekomendinde esprimi ĉi tiun novan senco de proksimumeco per adverboj, ekz-e *ĉirkaŭ*, *proksimume*, aŭ eĉ *kelke* (ĉar *kelka* antaŭ abstrakta substantivo jam akiris analogan signifon en la Z-aj ekzemploj: *kun kelka hezitado* aŭ *en kelka rilato*.) kaj rezervi la afiksan uzon de **kelk** por la Z-aj sencoj. G.W.

FI

Interjekcio, esprimanta indignon aŭ abomenon. Prefikse uzata, ĝi esprimas la samon.

Dum -aĉ- esprimas plie senvalorecon, maltaŭgecon, **fi-** esprimas naŭzecon aŭ moralan kondamnon.

Ekzemple: *fihomo* (naŭza aŭ malmorala homo; *homaĉo*: senvalora homo); *fipopolo* (kanajlaro), *fidomo* (misfama domo), *fiparoli* (maldece, malĉaste paroli); *fivirino* (indigniga malĉastulino); *fiferco* (senhonta ŝerco); *fidrinkejo* (naŭza drinkejo); *fiago* (abomena, malnobla, malĉasta ago).

Rim. Malofte, kiel arkaismon, oni trovas ankoraŭ la prefikson **fi-** en la senco de -aĉ-; ekzemple: *fiĉevalo* (ĉevalaĉo); *fiventro* (ventraĉo); *fihundo* (hundaĉo).

Memstare: *fia*: malnobla, naŭza, malĉasta; *fiaĵo*: malnoblaĵo, naŭzaĵo, malĉastaĵo; *fie*; *fiulo*; *fieco*.

FUŜ, MIS

427 **Fuŝ-** antaŭ verba elemento estas metita regule, do ne estas vera prefikso: *fuŝverki* (fuŝe verki), *fuŝfari*, *fuŝpentri*, *fuŝkuiri*. Regulaj estas ĝiaj kunmetoj ankaŭ tiam, kiam la agverbo estas pluformita per finaĵo: *fuŝverko* = (fuŝverki)-o; *fuŝkuiro* = (fuŝkuiri)-o, aŭ per sufiksoido: *fuŝkuiristo*, *fuŝpentristo*. Sed pro analogio oni uzas kelkfoje **fuŝ-** antaŭ nomo de profesiulo ne esprimita per **-isto**; tiam ĝi fariĝas vera prefikso: *fuŝaktoro*, *fuŝtajloro*, *fuŝfilozofo*.

Mis- estas sence parenca al **fuŝ-**, kaj ili estas kelkfoje eĉ interŝangeblaj: *fuŝkuiri* aŭ *miskuiri*. Tamen, **fuŝ-** esprimas artan aŭ metian malperfektecon, dum **mis-** signas malbonecon aŭ erarecon. Krom la regula verbo-prefiksoida uzado (vd. § 368), ankaŭ **mis-** povas aplikigi kiel vera prefikso: *miskvalito*, *mismaniero*, *misodoro*, *mishumoro*, *misherbo*, *misformo*.

NE

428 La prefikso **ne-** simple neas la enhavon de la postsekva elemento, kiu povas esti substantivo: *ne-germano*, *ne-judo*, *ne-kristano* kaj adjektivo: *nebona*, *neutila*, *necerta*. Ĝi kelkfoje havas sencon proksiman al tiu de **mal-**, precipe antaŭ adjektivoj, sed ĝia esprimforto estas malpli granda: ĝi propre montras la foreston de kvalito, dum **mal-** montras la ĉeeston de la kontraŭa kvalito; iu manĝaĵo estas *neutila*, se ĝi ne nutras, *malutila*, se ĝi difektas la sanon.

Antaŭ substantivoj de konkreta senco ĝenerale oni uzas **ne mal-**, sed **ne-** (vd. § 420). Ankaŭ en la du esceptoj (*malamiko*^Z kaj *malhomo*^Z) validiĝas propre la kvalita senco de la vorto (*malhomo* = malhomeculo).

VIC

429 **Vic-** kiel prefikso havas signifon: dua en rango, anstataŭanto: *vicreĝo*, *vicprezidanto*, *vicdirektoro*, *vicmajstro*, *viclaborestro*, *vicdelegito*, *vicambasadoro*, *vicĉefinspektoro*.

Rim. Tiu prefiksa senco de **vic-** (anstataŭa) povus esti utiligata tiamaniere, ke paralele kun la iom peza **anstataŭ** oni uzus ankaŭ la formon **vic'al** (analoge al **dank'al**), do dusilabajon **vic'al** trisilabaĵo.

Ni proponis **vic-** prefikse ankaŭ por signi ne laŭsangajn gepatrojn aŭ gefilojn (vd. § 425, **Rim.**): *vicpatro*, *vicfilo*, *vicfrato*.

PREFIKSIĜO DE PREPOZICIOJ

Ni parolas pri prefiksiĝo de prepozicioj, kiam la kunmeto postulas adjektivan analizon de la antaŭmetita prepozicio.

430

Tiaj prefiksiĝemaj prepozicioj estas:

Al (en la senco "kroma, akcesora"): *alnomo, almanĝaĵo, alplando*;

Antaŭ: *antaŭrimedo, antaŭsigno, antaŭtempo, antaŭvespero, antaŭbrako, antaŭĉambro, antaŭgvardio, antaŭparto, antaŭtuko, antaŭurbo*;

Ĉirkaŭ: *ĉirkaŭfrazo*;

En: *enlando*;

Inter: *interpaco, interspaco, intertempo, intervojo, interlarĝo, interlongo*;

Kontraŭ: *kontraŭrimedo, kontraŭsenco*;

Krom: *krompersono, kromseĝo, kromfolio, kromsenco, kromvirino, kromnomo, kromsilabo*;

Kun: *kunfrato, kunteksto, kunkulpulo*;

Post: *postremilo, postnomo, postgvardio, postkongreso*;

Sub: *subsenco, subjupo, subvesto*;

Super: en la senco propra: *supervesto, supersigno*; en senco metafora: *superhomo*; en la senco "kroma": *supertago, superjaro*.

PSEŬDOPREFIKSOJ

- 431** Kelkaj elementoj ne-E-aj plurfoje renkontiĝas en la komenco de vortoj, tiel ke ili ŝajnas prefiksoj. Tiaj estas **anti** (*antidoto, antikristo, antinomio, antipatio, antipodo, antisemito, antisepto* ktp.), **dia** (*diabeto, diademo, diafana, diafragmo, diagnozo, diagonalo, dialogo, diametro* ktp.), **epi** (*epilepsio, epilogo, episkopo, epistolo, epitafo, epiteto* ktp.), **eŭ** (*eŭfemismo, eŭgeniko, eŭkaristio*), **peri** (*periferio, perihelio, perimetro, periskopo, peristilo, peritoneo*) ktp. Ili estas grekaj elementoj, troviĝantaj en grekvortaj kunmetoj. Sola el ili, la tute internacia **anti**-havas ŝancon iĝi E-a prefikso, en la senco *kontraŭa* (ne sole mala, sed ankaŭ malamika): *antiesperantisto, antineologisto*.

**IV. KRITIKO DE LA
ESPERANTA VORTFARADO**

- 432 Tiun kritikon oni povas fari el du vidpunktoj, *interna* kaj *ekstera*. Interne, oni povas demandi, ĉu la Esp-a sistemo estas sufiĉe kompleta por esprimi ĉiujn bezonatajn nuancojn, precipe de la teknika lingvo. Ekstere, oni povas esplori, kian rolon ludas aŭ devas ludi la vortfarado en la kadro de la lingva vortotrezoro. Tiujn du demandojn ni pritraktos koncize en la sekvantaj du ĉapitroj.

A. — LA VALORO DE LA VORTSISTEMO

- 433 La Esperanta vortsistemo estis plurfoje atakata pro siaj mankoj; la unua granda atako venis de L. Couturat, unu el la "patroj" de Ido. Li ellaboris la derivsistemon de Ido baze de logistikaj konsideroj, kaj starigis kiel neeviteblan postulaĵon la faman *principon de renversebleco* aŭ *returnebleco*. Lia severa akuzo estis, ke E-o ne observas tiun gravan principon. Kvankam ĉio ĉi jam apartenas al la historio, eble ne estos seninterese diri ion pri tiu principo:

La "renversebleco" postulas, ke ĉe finaĵo-ŝanĝo ne ŝanĝiĝu la gramatika karaktero de la antaŭfinaĵa vortelemento. Tial *martel-i* en Ido estas *martelagar*, kaj *kroni* estas *kronizar*. Ŝanĝante la finaĵon verban de tiuj agvortoj je la substantiva -o, oni ricevas *martelago*, *kronizo*. Reŝanĝante (renversante, returnante) la finaĵojn oni revenas al *martelagar* kaj *kronizar*.

Tiu principo tamen ne ŝajnas tiel grava, ĉar ĝi ne validas en multaj naciaj lingvoj. Ekz-e: F. *couronne* - *couronner* - *couronnement*; A. *crown* - *to crown* - *coronation*; G. *Krone* - *krönen* - *Krönung*; R. *korona* - *koronovatj* - *koronovanie*. Jen, en ĉi tiuj kvar lingvoj la verbo estas senpere derivita kaj pluformiĝas per speciala substantiviga sufikso, tiel same kiel en E-o: *krono* - *kroni* - *kronado*. La "renversebleco" do estis arbitra principo en tia formo. Sed ankaŭ en E-o ekzistas renversebleco, kiun formulis Saussure, kaj kiun ni demonstris en la Resumo de la § 286:

La senco refariĝas la sama ĉiufoje, kiam la ekstera formo de la vorto fariĝas denove la sama.

La fakto estas, ke la derivsistemo de Ido kostis tre multe al la lingvo, ĝin faris rigida kaj malfacila por flua uzo: oni devis ĉiam atenti por ne ellasi iun sufikson arbitre postulatan de la derivregularo. Se Ido iel estus disvastiĝinta kaj vaste uzata, ĝi nepre estus plisimpliĝinta, tiurilate, kaj iom post iom reveninta al la sistemo de E-o.

Oni ankaŭ riproĉis al E-o, ke la a-finaĵo en ĝi estas dusenca (jen -*kvalita*, jen -*rilata*). Nu, oni povus pri tio facile helpi, uzante por kvalita senco la sufikson -*eca* kaj por rilata senco la prefikson *pri-* (*prinutra problemo*) aŭ la prepozicion al pluformitan je -*ala* (*reĝala ĝardeno* = ĝardeno ala al reĝo). Sed oni neniam uzas -*ala* kaj nur malofte -*eca* kaj *pri-*, ne utiligante tiujn proponiĝantajn eblaĵojn: tio plej bone montras, ke en la praktiko tia distingo pruviĝas preskaŭ tute superflua.

La elpensintoj de aliaj sistemoj (Occidental, fariĝinte Interlingue, Novial, Interlingua) riproĉis al E-o, ke ĝi, per sia vortfarado, kreas vortformojn, kiuj diferencas de la samsencaj vortformoj de la "naturaj lingvoj". Kaj ilia plej granda klopodo estis fari tiajn "naturajn" vortformojn. Sed por tio ili pagas grandan koston: unue ili devas ŝanĝi la formon de la radikoj antaŭ la sufiksoj (ĉar la model-lingvoj estas fleksiaj); due, ili devas alpreni plurajn samsignifajn sufiksojn (ĉar la model-lingvoj ne sufiksas unuece). Ekz-e, por **-eco** Occidental havas ses sufiksojn: *-erie, -ess, -itá, -ta, -ore, -ie*. El ĉi tiuj la lingvuzanto devas elekti tiun, kiun la modellingsvoj uzas ĝuste ĉe la aplikota radikoj. Por tiu, kies lingvo ne estas latinida, tio estas granda kaj superflua ŝarĝo, se ne paroli pri tio, ke plurfoje eĉ la diversaj modellingsvoj ne kongruas tiurilate; ekz-e al F. *longueur* (Occ. *longore*) respondas I. *lunghezza* (**longess*). Oni do devas scii, ke Occidental ĉi-okaze favoris la francan modelon. Efektive, tia naturisma manio faras la artingvon simpla sklavo de la "modellingsvoj". E-o, male, havas memstarecon, havas propran firman spinon.*

Rilate sian vortformadon, E-o staras inter la tro "elfarita" Volapük kaj similaj sistemoj, kies aŭtoroj konstruis ĉiun vorton laŭ diversaj aprioraj principoj (kaj per tio la evoluon de la lingvo por eterne dependigis de unu sola persono aŭ de gvidanta institucio), kaj la tro imitaj "naturismaj" projektoj, kiuj ne povas stari sur la propraj piedoj. Tiu mikso de natureco kaj reguleco, kiu ĝin karakterizas, ebligis, ke la *uzado*, preskaŭ oni povus diri: la *amasoj* evoluigu kaj perfektigu la lingvon, adaptu ĝin al la ŝanĝigantaj bezonoj.

Ne el vidpunkto de fremdaj principoj, nek laŭ supraja trarigardo, sed elinterne, post ĝisfunda studado kritikis la E-an vortsistemon E. Wüster. En sia libro "Konturoj de lingvonormigo en la tekniko" li skribas: "E-o estas senlime derivkapabla – kaj en tiu ĉi rilato nekompareble supera al la naciaj lingvoj –, kiam temas pri derivaĵoj de radikoj kaj afiksoj. Sed kiam oni devas fari derivaĵojn de vortoj *kun nepleonasmaj finaĵoj*, E-o estas parte malpli derivkapabla ol la naciaj lingvoj, almenaŭ ol ties parto de fremdvortoj".

La manko malkovrita de Wüster do estas, ke la anstataŭigo de nepleonasmaj finaĵoj, elfalantaj ĉe la pluformado, ne ĉiam estas ebla per adekvataj parelementoj.

1. Mankas parelemento-sufiksoido de la o-finaĵo. Taŭgas nek *ec* (= kvalito), nek *aĵ* (= konkretaĵo, en kiu manifestiĝas la respektiva kvalito). Tiel do la nociojn *varmo*, *forto*, *acido*, *sano* oni ne povas pluformi per rilatadjektiva finaĵo, ĉar *varma*, *forta*, *acida*, *sana* estas kvalitatadjektivoj, kaj taŭgas nek *varmaja*, *fortaja*, *acidaja*, *sanaĵa*, nek *varmecca*,

* Pli da detaloj oni trovas en "Lingvo kaj Vivo" de G. Waringhien.

forteca, acideca, saneca. Same: *acidigi* signifas nur igi *acida*, do mankas vorto por *igi acido* (ekz-e "*acido-igi*" la *klorradikon per almeto de hidrogenradiko*).

2. Mankas parelemento de la rilata a-finaĵo. *Statigi* signifas *igi ŝtato*, do mankas vorto por diri *igi ŝtata*.

3. *Ado* ne estas tute taŭga anstataŭanto de la i-finaĵo, ĉar ĝi enhavas, ĉe momentaj agoj, la sencon de ripetado. *Martelado* do signifas batadon per martelo, kaj mankas vorto por signi unu solan baton.

"Tamen, skribas plu Wüster, tiu ĉi manko ne estas grava, ĝi povus esti facile forigita, se oni enkondukus sufiksojn, kiuj, ĉe la pluformado, venus sur la lokon de la finaĵoj (eble -al- por a-, -ir- por -i kaj -on- por -o"). Laŭ tio, oni havus: *acidona, acidonigi, stataligo, marteliro, martel-irigo*.

Antaŭ pli ol dudek jaroj, ni diris ĉi tiun Wüsteran solvon teorie perfekta, sed praktike tute senŝanca; ĉi lastan konstaton de tiam pravigis la tempo. La kaŭzon de la senŝanceco ni vidas en tio, ke la ordinara homo apenaŭ akceptas sufikson, kies "signifo" estas: "elfalanta nepleonasma o-finaĵo".

Sed estas certe, ke la kritiko de Wüster tre klare prezentas la problemojn, eble ne gravajn en la komuna lingvo, sed signifajn en la lingvo teknika, kie plej doniĝas neceso de vortkreo kaj kie grava estas ankaŭ la ekzakte fiksita vorto-senco.

Laŭ nia opinio, oni povus proponi jenan solvon, malpli perfektan, certe, kaj eble eĉ pli komplikitan, sed tamen ŝajne pli akcepteblan, ĉar ne tiel matematike esoteran, kiel la Wüstera propono.

* * *

435

I. *Parelemento por la o-finaĵo*. Ĝi povas esti bezonata:

a) ĉe pluformado de adjektivradikaj substantivoj per la rilata a-finaĵo. Ekzistas tri specoj de solvo:

1) Kunmetoj: *varm-energio, fort-efekto, acidradiko, san-inspektoro*: ĉi tie validiĝas la substantiviga vortefiko de la substantiva ĉefelemento.

2) "Fremdvortoj": *termika energio, dinamika efekto, sanitara inspektoro*.

3) La sufiksoido -ala (vd. § 352): *varmala, fortala, acidala, sanala*. Ĉi lasta, cetere, estas unu el la proponoj de Wüster, certe la plej akceptebla el la tri, kvankam ĝi donas neinternaciajn formojn ĝuste al internacie uzataj teknikaj terminoj. Ĝi povus esti uzata eĉ post verbaj radikoj por neprigi la rilatan sencon: *maĉala doloro* (= doloro ĉe maĉado). Sed, kompreneble, ĝia uzo estus tute sendeviga, kaj postulata nur de la neceso. *Ala* kiel adjektiva ĉefelemento, laŭ VER. II. (vd. § 289), substantivigas sian flankelementon, do perfekte anstataŭas substantivigan sufikson.

b) ĉe pluformado de adjektivaj radikoj per la i-finaĵo por la markado de ago (do ne de stato, kian sencon havas tiaj formajoj: *acidi* = stati acide,

aŭ esti acida). Oni povas sin helpi per la sufikso **-umi**, aŭ per la teknika sufiksoido **-izi** (vd. § 360): *acidumi, acidizi* (= provizi per acido).

c) ĉe pluformado per **-igi** aŭ **-iĝi**, por neprigi la substantivecon de la flankelemento. Tiu ĉi bezono ŝajnas pli teoria ol fakta. Se tamen oni renkontus ĝin, oni povas: aŭ konservi la o-finaĵon: "*la movenergio parte varmoigas*"; aŭ enkonduki la pure teknikan sufikson **-ifi** (= **-oigi**; vd. § 414): "*la nomada popolo ŝtatifiĝis*"; "*sapifi grasojn*". Tio efektive apenaŭ ŝajnas necesa en la komuna lingvo.

Rim. I. Kiel kuriozaĵon oni povas noti, ke en E-o ekzistas parelemento por la o-finaĵo: ĝi estas la sufikso **-op** (kiu ĝuste en Pra-Esperanto havis la formon: **-o-**). Efektive *triopa, multope* estas nenio alia ol *trio-a, multo-e*. Tamen **-op** tiel ligiĝis kun la numeraloj, ke tio ŝajnas malhelpi ĝian ĝeneralan uzon por parelemento de la o-finaĵo.

II. Sufiksoido anstataŭ la rilata a-finaĵo. Ĝia ĝenerala neceso ĉe la pluformado per **-igi** kaj **-iĝi** estas ĉesigita per la konvencia regulo, ke **-igi** kaj **-iĝi** ĉiam postulas antaŭ si adjektivan flankelementon kaj neniam substantivan. Laŭ tiu ĉi regulo do *ŝtatigi* signifas igi ŝtata; *ŝtonigi* = igi ŝtona; *reĝigi* = igi reĝa, kio montras, ke oni retrovas ĉi tie la saman elastecon de senco, kiel ĉe la a-finaĵaj vortoj: *ŝtata* (= ŝtat-apartena), *ŝtona* (= el-ŝtona), *reĝa* (= kiu estas reĝo, ekz-e: *reĝa persono*). En okazo de neceso(?), oni povus uzi, por marki tute klare la rilatadjektivecon de la flankelemento, la prefikson **al-** (*alŝtatigi fervojkompanion*) aŭ la prepozicion **al** ĉefelemente (*ŝtataligi lernejon; lokaligi = lokalizi*).

III. Sufiksoido por la verbfinaĵo. Ĝi povas esti bezonata:

a) ĉe pluformado de neverbaj radikoj anstataŭ **-ado**, por signi unu solan momentan agon (**-ado** nome enhavas la kromsencon de ripetado). En tiaj, cetere maloftaj, okazoj de neceso, oni povas sin helpi per kunmetoj kun la preciza vorto: *martelbato, brostiro, peniktuŝo, ponardopuŝo, glavopiko* ktp., aŭ per la ĉiamhelpa **-umo**, ekz-e *pinglumo de skarabo, tenajlumo, butonumo*. Iafaĵe oni povas fruktuzi la inversan vertefikon de la verbaj prefiksoidoj: ĉi tiuj, ĉar ili povas rilati nur al verboj, verbigas post si neverbajn radikojn: *reformo* (= reform-i-o), *eksango* (= eksang-i-o).

b) ĉe la pluformado de neverbaj radikoj per **-igi** kaj **-iĝi**, por signi faktitivan aŭ medialon. Kiel ni montris (§ 358, 3), se la flankelemento estas instrumento la agecon sufiĉe certigas la senca logiko (*marteligi* = igi marteli), ĉe aliaj helpas **-um** (ekz-e: *venenumigi* = igi veneni) aŭ aliaj sufiksoj (**-ad-**, **-ant-**, **-at-**, teknike **-iz-**).

c) antaŭ substantivaj sufiksoj, por signi la agan elementon, kiam la flankelemento estas substantiva. Ankaŭ ĉi tie doniĝas pluraj eblaĵoj: *ankradejo* (= ejo de ankrado) apud *ankrejo* (= ejo de ankroj); *sapumuĵo* aŭ *sapaduĵo* (= ujo de sapado) apud *sapujo* (= ujo de sapo); *kupradisto*, *kuprumisto* aŭ *kuprizisto* apud *kupristo* (la laboristo, kiu aplikas kupron al io, kontraste al tiu, kiu prilaboras la kupron mem).

* * *

Ni kredas, ke ĉiujn bezonojn oni povas kontentigi per la ĉi-supre cititaj rimedoj. Ili permesas doni al la vortoj plej precizan sencon kaj tamen ne pezigas aŭ malfaciligas la lingvuzon, ĉar ili ne estas devige aplikataj, sed servas nur por la okaza formado de terminoj.

Rim. II. Kiel ni vidis, tra la tuta pritrakto de la vortfarado gvidis nin la kategoria divido de la radikoj: ĝi estas la vera bazo de la E-a vortkonstruado. Tamen, la elasteco de la finaja pluformado malrigidigas tiun dividon, ofte permesas forgesi pri la gramatika radikkaraktero kaj apliki t.n. "resumajn formojn" (vd. § 331). Krome, per la vortefikoj (rekta kaj inversa), kaj per la latentaj finaĵoj estigitaj de ili, oni povas klarigi kaj pravigi formojn, kiuj laŭ la strikta konsidero de la radika kategorio ŝajnas neregulaj, inter ili ankaŭ la t.n. hibridajn radikojn (vd. §§ 296, B., 303-307). Jen, certe, unu el la kaŭzoj, kial la kategoria divido tiel longe ne estis akceptita de multaj.

La libero kaj elasto de la E-a vortformado ebligis, ke la lingvuzo poluru la lingvon ankaŭ koncerne la gramatikan radikkarakteron. Kelkaj "resumaj" formoj montrigis tiel oportunaj, ke ili fariĝis ĝenerale uzataj, kvankam ilia rigida senco estis alia; ties sekvo estis, ke por ĉi tiu alia senco oni komencis uzi alian formon, alivorte: kelkaj radikoj transglitis el unu kategorio en alian. Ekze **flor** kaj **vest** estas origine verbaj radikoj, sed nun oni uzas ilin kiel substantivajn (*floro*, *vesto*), kaj la respektivajn agojn oni signas per **-ado** (*florado*, *vestado*). **Barbar** estis origine (*I-a Oficiala Aldono*) adjektiva radiko, sed nun ĝi uzigas substantive (*barbaro* signas personon, *barbarulo* ne estas uzata). Sed ĉies ĉi detala esploro jam estas afero de vortaro, ne de gramatiko; revizion ĉi-koncerne entreprenis E. Wüster (*La Oficiala Radikaro*) kaj plenumis la Akademio per sia "Baza Radikaro Oficiala", iniciatita de A. Albault ("Aktoj de la Akademio" II., 1975).

Studante la diversajn regul-aplikojn, vidante la parentezajn krampojn kaj la sagojn kaj aliajn turmentilojn, la leganto eble havos la impreson, ke E-o estas diable malfacila. Sed, aliflanke, tion refutas al li lia propra sperto: li uzas ja facile la lingvon, eĉ tiujn vortojn, kiuj post la analizo pruviĝas timindaj monstroj kun sia implikita strukturo. Kiel klarigi ĉi tiun kontraŭdiron? Nu, tiel, ke teorie eĉ la plej simplaj ĉiutagaĵoj povas esti malfacile analizeblaj, kaj eĉ la plej ĉarmaj allogaĵoj povas esti cerbopreme implikitaj en sia esenco. Oni sinforgese ĝuas la dancmovon de baletistino, sed oni hororus devante lerni, kiaj muskoloj laboras kaj kiaj statikaj leĝoj validiĝas ĉe tiu libele gracia movo. Tamen ne estas sensignife scii ankaŭ tion.

Kiel konkludon post longa kaj peniga vojo tra analizoj kaj sintezoj kaj demonstroj, oni povas trankvile eldiri, ke E-o per sia vortfarado estas senlime plastika lingvo kaj supera ĉi-rilate al ĉiuj naciaj lingvoj kaj ĉiuj lingvo-projektoj. En ĝi, unuflanke, oni povas fari vortojn kun la plej pedanta ekzakta precizigo de la senco; aliflanke, dank' al la elasteco donita per tiuj grizaj reguloj pri vortefiko, oni povas improvizi vortojn kvazaŭ skizajn, kiuj ricevas sian vivon el la kunteksto kaj ĉarmas ĝuste per sia senpedanteco, per sia papilia facileco. Al ĉi lasta eblaĵo oni dankas tiun mirindaĵon, ke lingvo, kiun kelkaj tiel malŝate kutimas nomi "artefarita", estas tiel taŭga, kapabla kaj kvazaŭ deloga kreigi por si poezion.

B. — LA ROLO DE LA E-A VORTFARADO

436

Ni ĵus vidis, ke tiu vortfarado estas ekstreme riĉa kaj elasta. Tial ĝi prezentis la tenton al multaj lertaj spiritoj, konstrui kunmetitajn aŭ derivitajn vortojn grandkvante por anstataŭigi gravegan parton de la internaciaj radikoj, kiuj penetris en la lingvon laŭ la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko. Krom la natura plezuro, kiun oni sentas en la persona kreado de logikaj kunmetoj por esprimo de malsimplaj ideoj, tiu tendenco estis fortigita ankaŭ de du aliaj emoj: la estetika sento, ke la lingvo fariĝas des pli bela, ju pli koheraj kaj sam-originaj estas ĝiaj elementoj; kaj la propaganda intereso, prezenti al la lernanto kiel eble malplej da lernotaj vortoj. Fine konsiderinda estas ankaŭ la fakto, ke en multaj orient-eŭropaj lingvoj, pro naciismaj kaŭzoj, oni penas pli kaj pli elimini la internaciajn vortojn kaj anstataŭigi ilin per pli-malpli trafaj vortkunmetoj.

Jam en la unuaj jaroj de E-o oni renkontas signojn de tiu tendenco: Bein elpensis ekz-e "tagnoktegaleco" anstataŭ la internacia "ekvinokso"; Beaufront proponis "turniĝanta alispecigilo" por traduki la internacian "rotacia transformatoro" ktp. Pli freŝdate, en sia "Suplemento al la Franca-Esp-a Vortaro" Grosjean-Maupin amuziĝis en la kolektado de kreaĵoj, kiel *suĉtubo* (= sifono), *kestego* (= arkeo), *transpagilo* (= ĉeko) kaj eĉ la Z-a arkaismo *naĝveturilo* (= boato)! Klopodo nedezirinda duoble: unue, ĝi kvazaŭ forfermus la internacian lingvon disde internacie uzataj terminoj, do prezentus por la fakuloj malfacilon anstataŭ avantaĝo; due, ĝi striktigus la vortaran bazon de la lingvo, primitivigus, malriĉigus ĝin, farus el ĝi ian Basic-Esperanton. Kaj oni rimarku, cetere, ke Zamenhof mem kiel eble plej malofte cedis al tia tendenco: la enmeto de la 15-a regulo en la Fundamentan Gramatikon sufiĉus pruvi tion, eĉ se ne konsideri, ke, en la Universala Vortaro kaj en siaj Germanaj Vortaroj, li sisteme enkondukadis la internaciajn terminojn por ĉiuj sciencaj nocioj, ekz-e *kolzo* kaj ne "oleobrasiko", *petrolo* kaj ne "ŝtonoleo", *genitivo* kaj ne "posedkazo" ktp.

Alia tendenco, multe pli aprobinda, penas limigi la kvanton de tiuj internaciaj vortoj, alprenante, el ĉiu vortfamilio, nur la komunan radikon: la dua duono de la 15-a regulo efektive rekomendas konstrui laŭ la E-aj kunmetreguloj anstataŭ simple transpreni la nacilingve derivitajn formojn. Tiel naskiĝis *imperismo* anstataŭ la antaŭa *imperialismo*, *nacismo* (*nacionalismo*), *impresismo* (*impresionismo*), *esprimismo* (*ekspresionismo*), *ekzistismo* (*ekzistencialismo*) ktp. La populareco de tiaj formoj montras la memstarecon, la vivoforton de la lingvo, kaj pruvas la senton de la E-istoj pri ĝi.

Se oni ekzamenas, laŭ teoria vidpunkto, kia devas esti la relativa amplekso de la kunmetitaj (aŭ derivitaj) vortoj en la vortaro de internacia lingvo, oni devas fari esencan distingon inter la teknika kaj la komuna lingvo.

En la teknika lingvo, estas utile, ke la ĉefaj nocioj estu esprimitaj per primitivaj vortoj, el tri kaŭzoj. Unue, por kiel eble plej komplete gardi la jam internacian vortotrezoron, kaj ne detranĉi E-on disde la radiko de la grandaj civilizaj lingvoj, t.e. disde la greka-latina bazo. Due, por konservi plej grandan klarecon en la posta kunmetado kaj derivado de tiuj terminoj inter si. Se oni, kiel Bein, uzus "tagnoktegalco" anstataŭ "ekvinokso", ne estus eble paroli ekz-e pri la "tagnoktegalcaj tempes-toj"; se oni, kiel sugestas tia vortaristo, uzus "popoltradiciaro" anstataŭ "folkloro", estus neeble paroli pri la "tradicioj de la folkloro", aŭ "folklortradicioj" (= "tradicioj de la popoltradiciaro"!) ktp. Trie, ĉar en kunmetita vorto oni ne esprimas ĉiujn elementojn de la kompleksa ideo, sed nur la ĉefajn, povas okazi, sur la scienca tereno, ke la spirito ne kapablas per tiuj ideo-elementoj precizigi la ekzaktan ideon kaj distingi ĝin de la aliaj najbaraj (ekz-e sub "malsanulejo", oni povas egale kompreni *hospitalo*, *sanatorio*, *preventorio* ktp.), dum la internacia radiko, ĝuste ĉar ĝi ne solviĝas per analizo en komunlingvajn elementojn, povas havi tre precizan, ne miskompreneblan difinon. Tiu lasta kaŭzo estas tiel forta, ke ĝi ofte eĉ neprigas la uzadon de aparta teknika vorto anstataŭ komunlingva radiko: ekz-e per "rondo", oni ne povus distingi la du ideojn de "cirklo" kaj "cirkonferenco"; al "fluo" oni devis substitui "kurento", ĉar ne ĉiuj elektrofluo estas kurentoj. Granda franca filozofo iam asertis, ke "la scienco estas bone farita lingvo"; reciproke oni povas almenaŭ postuli, ke la lingvo ne malhelpu la klaran kaj facilan eksplikadon de la scienco. La neeblo, ekz-e, forme distingi la vortojn *radiofonio*, *radiogramo*, *radiotelegrafio*, en kiuj la radikalo *radio-* aludas la elektromagnetajn ondojn, disde la vortoj *radiofotografio*, *radioskopio*, en kiuj la radikalo *radio-* aludas la tiel nomatajn iks-radiojn (aŭ Rentgen-radiojn), kaj disde la vortoj *radiologo* kaj *radiologio*, kie la radikalo *radio-* aludas la radiumon, estas bedaŭrinda konfuzajo malinda je teknika lingvo; kaj tion ne pravigas la fakto, ke sama konfuzajo ekzistas en preskaŭ ĉiuj naciaj lingvoj, ĉar ĝuste la nia devus superi ilin sur tiu kampo, kaj efektive povus facile tion atingi. La vorto *radioterapio* estas bona pruvo pri la neceso distingi la diversajn radiojn, ĉar ĝi egale povas signifi la kuracadon per simplaj elektraj radioj, aŭ per iks-radioj aŭ per radiumado.

En la komuna lingvo, la demando estas iom alia. Ĉar la scienca precizeco tie ĉi ne estas plu bezonata, oni povas pli larĝe helpi la memoron per uzado de kunmetitaj vortoj; tio estas des pli aprobinda, ke multaj naciaj lingvoj vaste praktikas tiun rimedon. Oni povas do meti la principon, ke ĉiufoje, kiam en du el la ĉefaj eŭropaj lingvoj la koncerna ideo estas esprimita per vortkunmeto, ankaŭ en E-o estas eble aŭ oportune provi la saman esprimmanieron. Tamen ankaŭ ĉi tie ni renkontas plurajn malfacilojn, kiuj devas limigi la kreadon de kunmetaĵoj:

a) unue, la kunmetita vorto ne estas ĉiam tiel klara per si mem, ke oni tuj komprenu ĝin; en tiu okazo estas pli saĝe prunti de nacia lingvo taŭ-

gan radikon, kiun memori ne estos pli penige ol la tro streĉitan kunmeton: ekz-e *buo* estas preferinda al "naĝbarelo", *ĉeko* al "transpagilo", *ŝpato* al "plugŝovelilo", *raŝtro* al "sarkplugileto", *pioĉo* al "hakfosilo", *stumbli* al "falpuŝiĝi", *aspekti* al "elrigardi" kaj *rezigni* al "rifuziĝi".

b) due, la kunmetaĵo povas esti tiel longa, ke ĝi fariĝas vere maloportuna en la ordinara lingvo. Oni ofte primokis tiun deziron pri mallongigo, kiel simplan fantazion de verkistoj; sed oni memoru, ke Zamenhof mem "deziris, ke la vortoj en tiu ĉi lingvo estu la plej mallongaj kaj ke la esprimado de pensoj estu en ĝi almenaŭ tiel mallonga, kiel en la lingvo hebrea" (O.V. pĝ. 273); efektive, diversaj obeendaj postuloj (parola komprenebleco, facileco de lernado ktp.) faris, ke E-o, pro sia propra strukturo, estas pli maldensa lingvo, ol ekzemple la angla aŭ la germana*; kaj estas alia fakto, ke ĉiufoje, kiam specialistoj ekuzas nian lingvon, ili kreas novajn mallongigitajn vortojn: tiel aperis *varo* kaj *trajno* (= "komercaĵo" kaj "vagonaro"), *kolbo* (= "pafilkapo"), *sparko* (= "elektrofajrero"), *staplo* (= "kolon-amaso") ktp. Ŝajnas do, ke vortoj kiel "fenestrokovrilo", "malsupreniri", "kinematografejo", "daktilografistino" ktp. estos pli-malpli frue anstataŭataj de pli mallongaj formoj (eble: *ŝutro*, *descendi*, *kinejo*, *tajpistino*);

c) trie, la enkondukon de nova vorto povas motivi ankaŭ tio, se iu pluformado de ia vorto estas samforma kun la kunmetaĵo de alia vorto. Tiaj okazoj ne estas multaj, ĉar ĉe la kreo de la lingvo Z. zorge observis ĉi tiun principon. Tamen, ni povas citi la vorton *nei*, el kiu oni povas formi la vorton *neebla* (kion oni povas nei), samforman kiel *ne-ebla* (kio ne povas esti). Tiun konfuzon oni povas ĉesigi per la enkonduko de *negi*^z (negebla). Same, anstataŭ *-ema* pli bone estus uzi *-iva* almenaŭ post *sent* (*sentiva*), ĉar ekz-e *sentema verkisto* estas dusignifa (*sentema* kaj *sen-tema*);

d) kvare, precipe en la literatura lingvo, oni ofte ekuzas radik-vorton anstataŭ kunmetaĵo pro la pli granda elvokiveco de la radikvorto. Pri tiu tendenco, rimarkebla jam ĉe Zamenhof, ni parolis en la §§ 411-412 kaj 420. Kiel pluajn ekzemplojn ni povas citi la vortojn por bestosonoj anstataŭ la kunmetoj kun *-bleki* (*heni*, *grunti*, *bei*, *meki*, *ĉirpi*, *hurli*, *kriĉi*, *kveri*, *kviki* ktp.).

Male, kelkfoje la metafora aŭ popol-aroma kunmetaĵo povas esti pli elvokiva ol la iom seka radikvorto, identa kun scienca termino: *laktovojo* (galaksio), *majskarabo* (melolonto), *cervoskarabo* (lukano), *mort-*

* Estas tiurilate bedaŭrindaĵo, ke Z., probable pro manko de vere internacia radiko, esprimis per mal-kunmetoj kelkajn gramatikilojn (*malantaŭ*, *malpli*, *mal-super*) kaj kelkajn tre uzatajn adjektivojn (*malbona*, *maldekstra* ktp.): tio, kaj precipe la pluformadoj el tiuj vortoj, pezigas la lingvon, sed, ĝuste pro ilia grandega uzateco, ĉia provo anstataŭigi ilin estas senŝanca, almenaŭ en la ĉiutaga lingvo.

papilio (atroposo), *pavopapilio* (saturnio), *hirundpapilio* (makaono), *marstelo* (asterio), *maraglo* (haliaeto), *marleono* (eŭmetiopo). Tie ĉi apartenas ankaŭ *neforgesu-floro* kaj *netuŝumino*. Sed oni devas atenti, ke tiuj popolaj nomoj ne ĉiam signas la saman objekton en la diversaj lingvoj: *majfloro* estas por angloj la kratago, por francoj aŭ germanoj la konvalo. Por germano *marhundo* estas foko, por franco ĝi estas skilio (t.e. speco de ŝarko), por anglo ĝi estas, senpartie, aŭ la unua aŭ la dua.

Cetere, eĉ tiu interdivido inter la simplaj (neologismaj) kaj kunmetitaj vortoj laŭ la ĉi-supre montritaj kriterioj ne elĉerpas la demandon. Restas ankaŭ la postuloj de la klareco kaj precizeco. La vortoj, kiuj estas formitaj per sufiksoidoj, prezentas ofte pli elastan sencon, kaj tial pli oftajn okazojn de esprimkonfuzo. Tio troviĝas precipe ĉe la larĝsignifaj sufiksoidoj *-aj-*, *-il-* aŭ *-um-*: *porkaĵo* povas esti viando aŭ maldecaĵo, *kovrilo* povas rilati indiferece al tiel diversaj aferoj, kiel poto, lito aŭ libro; *pafilo* povas ĵeti ŝtonetojn aŭ kuglojn; *buŝumo* povas malhelpi hundmordon aŭ helpi al tenado de objekto en la buŝo ktp. Tiu stato de relativa nedifiniteco povis esti tolerata dum la junaj jaroj de la lingvo, sed kun la kresko de la literaturo kaj la partoprenado aktiva de tre diverslingvaj esperantistoj, oni sentis la bezonon pri pli granda precizeco. Tial la verkistoj penis iom post iom specialigi tiun aŭ alian formon al tiu aŭ alia signifo. Zamenhof, ekz-e, iniciatis la formojn *kovrotuko* anstataŭ (*vizaĝ*)*kovrilo* kaj *fermoplato* anstataŭ (*kesto*)*kovrilo*; same li distingis inter la *pafarko* por la sagoj, la *blovpafilo* por la buletoj kaj la simpla *pafilo* por la kugloj. Analoge, oni ekuzis *porktranĉo* kaj *buŝpeco* por unu el la signifoj, lasante la sufiksajn formojn por la alia.

Tiuj ekzemploj estas imitindaj, ĉiufoje kiam unu kompleksa ideo ne trovis ĝis nun la plej taŭgan esprimilon; sed oni ne devas kaŝi al si, ke tio prezentas ampleksan kaj temporaban entreprenon, kiu povos efektiviĝi nur per la komuna laboro de diverslingvaj kompetentuloj kaj per la esploro, far la vortaristoj, de la reagoj de la publiko al tiucelaj provitaĵoj; nur poste estus la rolo de la E-a Akademio elekti kaj oficialigi la plej taŭgajn el ili, ĉar ties fiksado estas almenaŭ tiel grava, kiel tiu de la simplaj radikoj. Tia metodo kaj maniero estas la sola, kiu povos certigi la harmonian ekvilibron inter la du fontoj de nia vortotrezoro, t.e. la depruntado kaj la aŭtonoma kunmetado.

INDEKSOJ KAJ ENHAVTABELO

I. INDEKSO DE LA TEMOJ

Klarigoj

1. La ciferoj signas la paragrafojn, la parentezaj ciferoj kaj literoj punktojn interne de la koncerna paragrafo. R = Rimarko.
2. La vortoj presitaj per ordinaraj literoj montras la titolojn de la paragrafo; la vortoj **dike** presitaj montras la E-ajn vortojn, pri kiuj temas en la koncerna paragrafo. Dividstreko post elemento (: al-) montras prefiks(oid)an uzon, antaŭ ĝi (: -al) sufiks(oid)an uzon.
3. La vortoj estas vicigitaj laŭ nepra alfabeto ordo; ekz-e *akuzativa* antaŭ *akuzativo*, *adjekto* post *adjektivo*.
4. Specialaj mallongigoj: dif. de = diferenca de; espr. de = esprimo de; supl. = suplemento.

A

ablativa	adjekto	212
	objekto	179 (3)
absoluta	adjekto	187
	participo	183 R. 1; 249
	por	268
	se	268
	tempodifino	193 (I. 1)
	verbotempo	271
absolute	uzataj verboj	119 (A); 177 R.
abstrakta	imperfekto	113 R. IV
abstraktiga efiko		
	de aj	328 (3)
	de ul	330 (3)
-aci		362
-aĉ-		410
	dif. de fi	426 R.
aĉet-objekto (espr. de)		209 R. II
aĉetprezo (espr. de)		209 R. II
-ad-	<i>(konjugacio)</i>	107; 110 R. III
	<i>(vortfarado)</i>	326; 357
adicio (espr. de)		87 (G)
adjektaj subprop-oj		243-268
adjekt-epitetoj		158
adjektiva	ĉefelemento	289; 294
	supl.	134
	predikativo	169 (a); 232 R. IV
	post agverbo	170 (4)
adjektivaj	radikoj	
	dif. de verbaj	283
adjektivaj	sufiksoidoj	295; 347-356
	suplementoj	134; 140
adjektivo		24
	<i>(morfologio)</i>	67-85
	adverbneŭtra formo	68 R.
adjektivoj		
	demandaj	82
	determinaj	75-85
	kolektivaj	83
	kvalifikaj	68-74
	kvantaj	84
	montraj	80
	nedifinaj	85
	neaj	85

	posedaj	79
	rilataj	81
	substantiva uzado	74
	(<i>sintakso</i>)	143-146
	(<i>vortfarado</i>)	
	flankelemento	
	de substantivo	291
	apudmeto	294
	kategorioj	286 (III)
	de ago, stato ktp.	299 (B)
adjektivprefiksoj		424
adjekto	(<i>difino</i>)	25; 183
	ablativa	212
	absoluta	187
	adjektiva	197 R.
	adverba	183
	akuzativa	184
	cela	209
	dativa	211
	distribua	207 (B)
	infinitiva	186
	instrument-indika	206
	kaŭza	208
	konceda	202
	koncerna	210
	kondiĉa	201
	loka	189-192
	maniera	205 (1)
	mezur-indika	207
	modala	205
	nominativa	187
	origina	203
	predikativa	197 R.
	prepozitiva	185
	rezulta	204
	separativa	199
	societa	198
	situacia	198-202
	stata	197
	stat-indika	200
	tempa	193-196
	traktativa	210
adjektoj	(paraleliga tabelo)	213
admoni	(modo post)	231 R. VI
admono	(modo post)	240 R. III

ad-substantivo	<i>(difino)</i>	31
	<i>(morfologio)</i>	35
	<i>(sintakso)</i>	176 (B)
adverba adjekto		183 (I)
	ĉefelemento	300
	epiteto	143 R. I
	flankelemento	294 R. I
	formo de participo	
	Vd. e-finajo!	
	predikativo	170 (4); 197 R.
	neuzenda	173 R. I
	suplemento	143
adverbaj	prefiksoidoj	365-370
	supl-oj	
	de adjektivo	143
	de adverbo	147
	de verbo	150
adverbo	<i>(difino)</i>	24; 88
	<i>(morfologio)</i>	88-92
	aŭ-finajaj	89
	derivitaj	92
	ĝemelaj	88 R. IV
	jesa kaj nea	91
	nesimetriaj	90
	primitivaj	88-91
	tabelaj	88
	anstataŭo de adjektivo	68 R.; 169 R. I; 173 R. I
	<i>(sintakso)</i>	147-149
	dif. de participo	183 R. III
	de predikativo	170 R. II
	cirkonstanca	183 (1)
	instrumenta	206 (B cc)
	kvanta (kun da)	84
	loka	183 (1); 190 (3)
	maniera	205 (1)
	predikativa	169 R. I; 173 R. I
	stat-indika	200 R. V
	tempa	183 (1)
	<i>(vortfarado)</i>	
	flankelemento de adjektivo	294 R. I
	vortkategorio	278
adversaj prop-oj		223
afiksoidoj		321
	<i>(difino)</i>	276 (2); 322

	<i>(divido)</i>	324
	<i>(studo)</i>	325-362
	specialaĵoj	323
afiksoj veraj		276 (2)
	<i>(studo)</i>	408-431
a-finajaj vortoj <i>(analizo)</i>		315
a-finajo		280 (2); 296
	elasta senco	286 (1); 296
	elizio	291 (C)
	propra senco	286 (II); 296
	vortinterna	309 (2)
afrikatoj		22 (B)
agant-adjekto		179 R. V; 206 A c; 208 R.I
	(pasiva)	155 R. I kaj II
aganto	(dif. de subjekto)	153
ag-aplikaj verboj		328 (2 e)
aglutina lingvo		276
ag-prop-o	<i>(difino)</i>	152
	<i>(studo)</i>	165-167
ag-verboj		119 (A)
aĝo (espr. de)		87 (I)
-aĝo		329 R. IV
ajn	<i>(morfologio)</i>	58 R. II; 63 R. II; 85
	konceda <i>(sintakso)</i>	258 (II)
ajna		85 R. V
ajne		222 R. V
-aj-		328
aj-substantivo	<i>(difino)</i>	32
	<i>(morfologio)</i>	32-34
	<i>(sintakso)</i>	76 (A); 133-134
akceli (modo post)		231 (2 B)
akcelo (modo post)		240 R. II
akcento		18; 20 (4)
akordo de	apozicio	130
	ekvivalento	131
	epiteto	128, 129; 158
	nominacio	132
	predikativo	169
	verbo	157
aktivo	<i>(difino)</i>	97
	<i>(morfologio)</i>	99-100
	<i>(uzado)</i>	119 (A)

aktualaj temp-adjektoj	193
akuzativa adjekto	184
supl. de ag-substantivo	139; 190 (A e)
de adjektivo	144 (a)
de adverbo	148
de verbo	150
akuzativo (<i>morfologio</i>)	34; 40
ĉe adverbo	92
(<i>sintakso</i>)	
objekta	176-178
adjekta	184
tempopunkta	184; 193
de daŭro	193 (II); 194 R.
de direkto	190 (3); 191 (3); 192
mezur-indika	184; 207 (A)
sisterona	178 R.I; (vd ankaŭ 192,1; 198 R.I.)
stat-indika	184 R. I
subjekto de infinitivo	233 (I a)
post anstataŭ	255 (B 1)
ĉe	192 R. I
ĉirkaŭ	87 (A)
de	135 R.
ĝis	87 (A)
kontraŭ	190-192
krom	255 (B 1)
po	87 (A), (F)
sidigi	192 (2)
tra	190 (2 cc)
trans	189. 7
prepoziciaj	122 R.
poziciaj prep-oj	191
(<i>vortkonstruo</i>)	
interne de kunmetaĵoj	309 (3)
akuzativprepozitivo	121; 185
al (<i>morfologio</i>)	
kombino kun prep-oj	122
(<i>sintakso</i>)	
ag-objekta	136-138
dativ-adjekta	211
dativ-objekta	206 (2)
direkta	190 (3)
ĉe faktitivo	119 (C); 206 R. II
ligilo de adjektiva supl.	144
lok-adjekta	190 (3)
loksuplementa	133 (F)
rezulta	204 R.

al-		374; 430
-al-		352; 362; 435
ale al		190 (3)
alfabeto		1-6
algebraj formuloj		87 (H)
ali-		424
alia		62; 64
	(prop-a supl. de)	146 (1)
alie	(klariga)	225
alies		62 R.
alinome		131
aliu		62 R.
almovo		190-192
al-objekto		179 (2)
almenaŭ	(<i>vortordo</i>)	273 (2)
alparolo		260 (3)
alt-		424
alternativaj prop-oj		222
alternativaj-koncedaj prop-oj		258 (IV)
altern-objektaj verboj		177 (2)
alternsubjektaj verboj		138 (2); 328 (2 c); 358 (3 a)
-ama		349; 361
ambaŭ		61
ambaŭ... kaj...		221 R. I
amita		113 R. III
-an-		332
analizo	de kunmetoj	313-316
	de a -finajaj vortoj	315
	de o -finajaj vortoj	314
	de verbfinaĵaj vortoj	316
	R (rilato)	291 (1)
	M (materialo)	291 (2)
	E (epiteto)	291 (3)
ankaŭ		89; 90 R. II
	(<i>vortordo</i>)	273 (1)
ankoraŭ		89; 90 R. X
	(<i>vortordo</i>)	273 (5)
anoncvorto		129 (3); 132
anstataŭ		199
	akuzativo post	255 (B)
	infinitivo post	255 (B)
	Vd. vic'al	
anstataŭ ke		255 (B)
anstataŭ-		375; 424
-ant-	(dif. de -em-)	349 R. I

antaŭ	ablativa	212 (4)
	dativa	211 (6)
	hor-esprima	87 (I)
	koncerna	210 (4)
	ligilo de adjektiva supl.	144 R. I
	loka	189 (1); 191; 192
	loksuplementa	133 (F)
	pozicia	189
	priskribsuplementa	133 (E)
	tempofina	195
	tempopunkta	193
	temposuplementa	133 (G)
antaŭ-		376; 430
antaŭ ol		117; 120; 248
antaŭtempaj	tempoprop-oj	247
-ant-	(dif. de -ul-, -ist-)	342 R. IV
anti-		431
apenaŭ	(du-rola)	89
	subjunkcio	247
	tempa adverbo	89; 248 R. III
aplikverboj		322 (2 c)
apogi sin	(kazo post)	192 (2)
apostrofo	de la o-finaĵo	15; 29
	de la aŭ-finaĵo	89 R. II; 300 R. IV
apozicio	(<i>difino</i>)	129 (1)
	(<i>studo</i>)	130
	adjektiva	132 R. I
	akordo	132 (b)
apud	koncerna	210 (4)
	loka	189; 192
	loksuplementa	133 (F)
	tramova	191 (2)
	(dif. de <i>ĉe</i>)	189 (2)
apud-		377
apudmeto	de vortelementoj	286 IV
	de adjektivo	290 (a)
	de adverbo	296 R. I
	de substantivo	291 (3)
-ar-		33; 333
aritmetikaj	formuloj	87 (G)
artikolo		76-78
	formo	76
	gramatikaj uzoj	78
	neuzo	76 R. VII
	<i>ĉe kies</i>	56 R. II

	ĉe plej	70 R.
	ĉe poseda adjektivo	79 R. II
	ĉe poseda pronomo	51 R.
	ĉe propraj nomoj	77
	ĉe unuj... aliaj...	64
as (= estas)		102; 277
asimilado	de konsonantoj	17
	de propraj nomoj	36; 38
-aspekta		361
aspektoj	<i>(difino)</i>	93; 98
	<i>(formoj kaj uzado)</i>	105-109
	ĉesa	109 R. VI
	daŭra	107
	fina	109
	komenca	105
	momenta	105
	ripeta	108
asterisko	Vd. steleto!	
-at	(pseŭdosufikso)	362
-at-	(participa)	
	<i>(uzado)</i>	113
	(aktiviga valoro)	119
atendi	(modo post)	231 R. III
atenti	(modo post)	231 R. II
-ator		362
atribua	agprop-o	172
	ecprop-o	173
atribuado		171-175
aŭ	alternativa	123; 131 R. I; 241
	ekvivalenta	131
	ĝustiga	222 (1)
aŭ... aŭ...		123; 222 (2)
aŭ-adverboj		89; 300 R. IV
-aŭ	eliziebla finaĵo	89 R. II
aŭto-		407
aŭto-aerbrems	(tipo de kunmeto)	297
averti	(modo post)	231 (2 a)

B

baldaŭ		89
bazaj numeraloj		87
bel-		424
belartoj		424 R.
bezoni	(modo post)	231 (B c)

bezono	(modo post)	240 R. III
blank-		424
bo-		417
bon-		424
bonfarto	(analizo de)	303
brun-		424

C

cel-adjekta	infinitivo	186; 209 R. I
	subprop-o	268
	(tempo en)	270 (4)
celaj	adjektoj	209
	kompletivoj	231 (2)
centjaro	(analizo de)	306; 314 (3)
certa		67; 85 R. II
cetera		83
ci		45 R.
-cio		362
cirkumflekso		3
	(anstataŭaĵoj de)	3
cis		120
	loksuplementa	133 (F)
cis-		378
citaĵo		132 (2)
citiloj		16 (1)

Ĉ

ĉapelino		339 (piednoto)
ĉar		123; 124
	ĉe kazo reala	251 (I 1)
	kaŭza	267
	klariga	225
ĉe	instrumenta	206 R. I
	konceda	202 (B a)
	koncerna	210 (4, 6)
	koncernsuplementa	133 (D)
	kondiĉa	201 (B)
	loka	189
	loksuplementa	133 (F)
	tempa	193 (I)
	(akuzativo post)	192 R. I
	(dif. de apud)	189 (2)
ĉe-		379

ĉef-		371
	(dif. de -estr-)	330 R.
ĉefelemento		288
	adjektiva	294
	adverba	300
	duobla	301
	substantiva	291
	verba	297
ĉefkomplekso		308
ĉefmembro		308
ĉefpropozicio		219 (2)
ĉesa aspekto		109 R. VI
ĉesi kun infinitivo		182 R. I
ĉi		54; 88 R. II
ĉia		83
ĉial		88 (3)
ĉiam		88 (2); 193
ĉie		88 (1)
ĉiel		88 (4)
ĉies		60
ĉio		60
ĉiom		88
ĉioma		84 R. II
ĉiom da		84 R. I
ĉiopova	(analizo de)	310 R.
ĉiopovo		314 (1)
ĉirkaŭ	loka	189; 192
	proksimuma	207 R. II
	tempa	193; 195
	ĉe numeraloj	87 (A)
ĉirkaŭ-		380; 430
ĉiu	(adjektivo)	83
	(pronomo)	60
-ĉj		276; 415
ĉu		123; 217
ĉu... aŭ...		230 (3); 257 (III)
ĉu... ĉu...		123; 222 R. IV; 258 (IV)
	neĝuste uzata	224 (4)

D

da		84 R. III; 86 R. I
dank'al		206; 264
danka	(distinga de dankema)	349 R. II
dativa	adjekto	211
	objekto	179 (2)

dato	(espr. de)	87 (B.R.I); 87 (I); 193 (I)
daŭra aspekto	Vd. durativo!	
daŭrigi	kun infinitivo	182 R. I
daŭro	(espr. de)	193 (II)
de	(<i>morfologio</i>)	
	kombino kun prep-oj	122; 191
	(<i>sintakso</i>)	
	ablativ-adjekta	212
	ablativ-objekta	179 (3)
	agant-adjekta	179 R. V; 208 R. I; 211 (1)
	disting-elekta	133 (B) R. III
	esencsuplementa	133 (C)
	kaŭza	179 R. IV; 208
	koncernsuplementa	133 (D)
	konsistsuplementa	133 (C)
	kvalitsuplementa	133 (E); 314 R.
	loka demova	190; 191
	loksuplementa	133 (F) R.
	mezursuplementa	133 (C)
	objekta	135; 287
	origin-adjekta	203
	originsuplementa	133 (B)
	poseda	133 (A); 132 R. III
	priskriba	133 (E)
	rilata	133 (A)
	subjekta	135; 136
	tempa demova	194
	tempsuplementa	133 (G)
	dif. de per	110 R. IV; 208 R. I
	(<i>vortfarado</i>)	
	analizilo	287 (1)
de-		381
de antaŭ		191 (1); 194
de ĉirkaŭ		191 (1); 194
de el		179 R. V; 191
deci	(modo post)	231 R. III
de kiam		252
dekstra flankelemento		297 (NB)
delasi		119 (C. R. VI); 367 R. I; 381 R. II
demanda sendependa prop-o		217
demandaj	adjektivoj	82
	pronomoj	59
	subprop-oj	
	Vd. dependaj demandoj!	

demandosigno		12
demonstrativo	Vd. montraj pronomoj!	
demovo		190-192
dentaloj		22 (A)
de-objekto		179 (3)
dependaj	demandoj	230 (3)
	epitetaj	241
	infinitivaj	233 (III); 236 (III)
	kompletivaj	230 (3)
	objektaj	233 (III)
	predikativaj	236 (III)
	subjektaj	232 (III)
	supozaj	257 (III)
	(verbotempo en)	270 (2)
de post		194
deriva ideo-esprimo		275
derivado		408-431
des... ju...		123
des malpli		221 R. II; 262 (I. B 6)
des pli		221 R. II; 262 (I. A 6)
des pli ke		225
deteni sin	(modo post)	235 R. II
determina adjektivo	(<i>difino</i>)	67
	(<i>studo</i>)	75-85
determinanto		41
determinato		25
determino	(specoj de)	75
devi	(signo de futuro)	112
	(signifo laŭ la modo)	116 R. I
	specialaj karakteroj	116 (d)
	anst. volitivo	231 R. VI; 240 R. I, III
	(<i>vortfarado</i>)	
	en kunmeto	309 (4)
deviga adjekto		208 (4)
devigi	(modo post)	231 (B.e)
dezira prop-o		215
deziri	(modo post)	231 (B.a)
deziro	(modo post)	240 R. II
dia-		431
diafanaj sufiksoj		285 R. ; 409
difina determino		75
digramoj		3
dik-		424
direkte al		190 (A 3)
dis		90 R. I; 277 R. I

dis-	365
disde	120; 179 R. V; 190
disfalaj flankelementoj	303; 319
distribua adjekto	207 (B)
distribuo	87 (F); 133 (J)
divers-objektaj verboj	177 (3)
divido (espr. de)	87 (G)
divido de lingvoelementoj	276
de vortoj	14 (B II)
dividstreko	14 (B)
do	123
akcenta	217 R.; 230 R. II
konkluda	224
domaĝe	92 R. I
domaĝi	92 R. I
domkonstrui (<i>analizo de</i>)	302; 306
du	51 R. II
duagradaj subprop-oj	219 (2 c)
dube estas (modo post)	232 (I b)
dubo (espr. de)	214 R. II
dum du-rola	24 R.
konjunkcio adversa	223 R. I
prep-o tempa	193 (II)
subjunkcio tempa	246 (B); 254
dum-	382
dume	92 R. II
dum ke	223 R. I
dum kiam	246 R. III
duobla ĉef- kaj flankelemento	297
duon-	425. I.
duondifina artikolo	85 (A)
duonfrato	425 R.
duonvokalo	17 R.
duopaj prepozitivoj	185
duope	61
dupunkto	11
durativo (<i>difino</i>)	98
(<i>studo</i>)	107
duvizaĝeco de numeraloj	87 (A, F)

E

-ebl	348
eblajo	329 R. I
-eblajo	323

eble estas	(modo post)	232 (I b)
ebleco		329 R. I
ebligi	(modo post)	231 R. V
eblo		329 R. I
	(modo post)	240 R. IV
-ec		329
	necesita ĉe kvalitigo	282 R.; 284
ec-prop-o	(<i>difino</i>)	152
	(<i>studo</i>)	168-170
-eca		329; 347
eĉ		90; 221 (I)
	(<i>vortordo</i>)	273 (I)
eĉ ne unu		85 (B)
eĉ se		258
edzo		322 R.
efektive		225
efikecaj subprop-oj		231 (B) (noto)
e-finaĵo	(<i>sintakso</i>)	
	ĉe adjektivo	68 R.; 169 R. I
	ĉe partícipo	99 R. II; 118 R. I; 183
	(uzado de)	118; 158; 183 (II)
	(neuzado de)	173 R. I; 183 R. II
	(<i>vortfarado</i>)	300
	vort-interna	309 (3)
-eg		411
-ej		334
ek		90 R. I; 277 R. I; 358
ek-	(<i>konjugacio</i>)	105; 106; 110 R. II
	(<i>vortfarado</i>)	366
ekde		120; 133 (G); 190; 194
ek-ke		252 R.
ekkria prop-o		214 R. I; 215 (B)
eks-		418
eksidi		105 R. III
eksplicita citaĵo		132 (II); 227
eksplikaj subprop-oj		230 (2)
	epitetaj	240
	instrument-indikaj	264 (1)
	kompletivaj	230 (2)
	manier-indikaj	261 (1)
	objektaj	233 (I)
	originaj	259
	predikativaj	236 (I)
	rezultaj	259
	separativaj	255 (B)

	societaj	255 (A)
	subjektaj	232 (I)
	(verbotempoj en)	270
ekster	loka	133 (F); 189
	separativa	199
	kun akuzativo	191 R. III
ekster-		383
ekskluziveco	(espr. de)	199 R. III
ekvivalentoj	(<i>difino</i>)	129
	(<i>studo</i>)	131
el	(<i>morfologio</i>)	
	kombino kun prep-oj	122; 191
	(<i>sintakso</i>)	
	ablativa	212
	instrumenta	206 (B)
	kaŭza	208 (3)
	koncerna	210 (5)
	konsistsuplementa	133 (C)
	loka	190; 191
	loksuplementa	133 (F)
	maniera	205 (1 e)
	origin-adjekta	203
	originsuplementa	133 (B)
	stat-indika	200 (A a)
	post komparativo	72
	post superlativo	73
el-	(<i>konjugacio</i>)	109
	(<i>vortfarado</i>)	384
elasteco de la finaĵoj		286
el de		120
elekta determino		75
elemento		301 (noto)
elementoj de la lingvo		276
	kompletigaj	277
	kompletigendaj	277
	latentaj	305
	memstaraj	277
	solstarivaj	277
	(divido de)	276
	(neŝanĝebleco de)	275
el inter		73; 191
elipsaj	ag-prop-oj	167
	ec-prop-oj	170 (1)
	subprop-oj	219 R.; 255; 257 (IV); 258 (III); 262; 263; 267

eble estas	(modo post)	232 (I b)
ebleco		329 R. I
ebligi	(modo post)	231 R. V
eblo		329 R. I
-ec	(modo post)	240 R. IV
		329
	necesita ĉe kvalitigo	282 R.; 284
ec-prop-o	(<i>difino</i>)	152
	(<i>studo</i>)	168-170
-eca		329; 347
eĉ		90; 221 (I)
	(<i>vortordo</i>)	273 (I)
eĉ ne unu		85 (B)
eĉ se		258
edzo		322 R.
efektive		225
efikecaj subprop-oj		231 (B) (noto)
e-finaĵo	(<i>sintakso</i>)	
	ĉe adjektivo	68 R.; 169 R. I
	ĉe partitipo	99 R. II; 118 R. I; 183
	(uzado de)	118; 158; 183 (II)
	(neuzado de)	173 R. I; 183 R. II
	(<i>vortfarado</i>)	300
	vort-interna	309 (3)
-eg		411
-ej		334
ek		90 R. I; 277 R. I; 358
ek-	(<i>konjugacio</i>)	105; 106; 110 R. II
	(<i>vortfarado</i>)	366
ekde		120; 133 (G); 190; 194
ek-ke		252 R.
ekkria prop-o		214 R. I; 215 (B)
eks-		418
eksidi		105 R. III
eksplicita citaĵo		132 (II); 227
eksplikaj subprop-oj		230 (2)
	epitetaj	240
	instrument-indikaj	264 (1)
	kompletivaj	230 (2)
	manier-indikaj	261 (1)
	objektaj	233 (I)
	originaj	259
	predikativaj	236 (I)
	rezultaj	259
	separativaj	255 (B)

	societaj	255 (A)
	subjektaj	232 (I)
	(verbotempoj en)	270
ekster	loka	133 (F); 189
	separativa	199
	kun akuzativo	191 R. III
ekster-		383
ekskluziveco	(espr. de)	199 R. III
ekvivalentoj	(<i>difino</i>)	129
	(<i>studo</i>)	131
el	(<i>morfologio</i>)	
	kombino kun prep-oj	122; 191
	(<i>sintakso</i>)	
	ablativa	212
	instrumenta	206 (B)
	kaŭza	208 (3)
	koncerna	210 (5)
	konsistsuplementa	133 (C)
	loka	190; 191
	loksuplementa	133 (F)
	maniera	205 (1 e)
	origin-adjekta	203
	originsuplementa	133 (B)
	stat-indika	200 (A a)
	post komparativo	72
	post superlativo	73
el-	(<i>konjugacio</i>)	109
	(<i>vortfarado</i>)	384
elasteco de la finaĵoj		286
el de		120
elekta determino		75
elemento		301 (noto)
elementoj de la lingvo		276
	kompletigaj	277
	kompletigendaj	277
	latentaj	305
	memstaraj	277
	solstarivaj	277
	(divido de)	276
	(neŝanĝebleco de)	275
el inter		73; 191
elipsaj	ag-prop-oj	167
	ec-prop-oj	170 (1)
	subprop-oj	219 R.; 255; 257 (IV); 258 (III); 262; 263; 267

elipso	de kopulo	170 (1)
	de predikato	167 (b)
	de subjekto	167 (a)
	de subjekto kaj predikato	167 (c)
	post ĉar	267
	post kiel	262
	post kvankam	258 (III)
	post kvazaŭ	263
	post se	257 (IV); 268 R. I
	elizio	ĉe substantivo
de la a-finaĵo		277; 291 (C)
de -aŭ		300 R. IV
de la artikolo (signo de)		76 15
elnombrado		131 R. II
elradikado (espr. de)		87 (G)
-em		349
	dif. de -ant	349 R. I
-emeco		349 R. III
en	koncerna	210 (1, 3, 5)
	konsistsuplementa	133 (C)
	loka	189; 190
	maniera	205 (1)
	mezura	207
	priskribsuplementa	133 (E)
	rezulta	204
	stat-indika	200 (A b)
	temp-adjekta	133 (G)
tramova	190 (A 2)	
	post superlativo	73
en-		385; 430
-end	(konjugacio)	96 (3)
	(vortfarado)	350
en la direkto de		190 (A 3); 192 R. II
en si		160 (II b)
-ent		362
epi-		431
epitetaj subprop-oj		237-242
	lokaj	244 R.
	nerektaj	242
	rektaj	238
	tempaj	251
epiteto	(difino)	25; 127
	adjektiva	128

adverba	25; 143 R. I; 147 R.
participa	128; 158
substantiva	129-132
de la objekto	174
de la subjekto	158
en kunmetado	291.3
dif. de predikativo	174 (2)
-er	335
escepte de	199
escepte se	257 (II)
esceptoj el la VER.	310
esceptokaze	199 R. I
-esk	329 328 R. VII; 353; 362
Esperanto (derivajoj de)	39 R. III
esper (modo post)	231 R. I
estante	200
estanteco	118 R. III; 329 R. V
estas bone (modo post)	231 R. IV
(tempo post)	270 R.
estas dube (modo post)	232 (I b)
estas eble (modo post)	232 (I b)
estas la horo, kiam	251
estas la unua fojo, ke	251 R.
estas tempo, ke (modo post)	242
estiel	200 R. II
estigi (modo post)	231 R. IV
-estr	336
et-	424
-et	412
ete	72 R. II
eterne	193
etimologia figuro	119 R. II
eŭ-	431
eviti (modo post)	231 (2 B g)
evito de kompleksaj tempoj	271
en tempoprop-oj	247 R. IV
en supozaj prop-oj	257 (I 4)

F

fakte	225
faktitivo (<i>difino</i>)	97
(<i>studo</i>)	103; 119

fals-		424
far		138 R.
fare de		120; 138
fari	(modo post)	231 R. IV
fermita silabo		21
fervojisto	(analizo de)	301
fi-		426
fiks-objektaj verboj		177 (1)
fina aspekto	Vd. aspekto!	
fina temp-adjekto		195
finaj tempoprop-oj		253
finaja pluformado		281
finajo nula	Vd. nula signo!	
finajoj	(<i>difino</i>)	276 (3)
	participaj	327
	pleonasmaj	279
	proprafunkciaj	279; 288; 301
	pseŭdopleonasmaj	306
	(elasta sencō de)	286
	(konservo de)	309
	(propra signifo de)	280
	(por pluformado)	281
finitivo		96 (1)
flanke de		138
flankelemento		288
	dekstra, maldekstra	301 (1)
	disfala	303; 319
	duobla	301
	kuntena	302; 318
flankkompleksoj		308
fleksia lingvo		276
-foj	dif. de -obl	87 (C) R. II
foje		193 (1); 196
	dif. de iam	196 R. I
-foje		196
foje-foje		88 (2); 196
fonetiko	(<i>difino</i>)	pĝ. 22
	(<i>studo</i>)	17-22
for		54 R. IV; 90; 277 R. I; 364 R. II
for-		367
for eĉ ke		265.3c
forlasi		119 R. II; 367 R. I; 381 R. II
formato	(espr. de)	87 (G) R. I

frakcio	(espr. de)	87 (D)
	decimala	87 (G)
frazelemento		23; 27
frazo	(difino)	pĝ. 179
	kompleksa	219; 218 N.B.
	kunfandita	218 R. III
	kuntirita	218 (3)
	simpla	218 NB
frazsintakso	(difino)	pĝ. 179
	(studo)	219-274
fremd-		424
frikativoj		22 (B)
fumi		119 R. I
Fundamenta Ekzercaro		pĝ. 18
Fundamenta Gramatiko		pĝ. 19-20
fundamenteco de la radikokategorioj		278 R. II
fuŝ-		427
futuro		329 R. V
futuro	(difino)	95
	(studo)	115 (3)

G

gardi sin	(modo post)	231 R. II
ge-		33; 419
genitivo		34 R. I; 42; 43
genro	ĉe substantivoj	32
	ĉe personaloj	43
genuiĝi		359 (1 c)
gerundio		99 R. II
gingivaloj		22 (A)
-grafi		342 R. III; 362
grand-		424
graŭ		201 (noto)
graŭ ke		157 (noto)
guturaloj	Vd. velaroj!	

Ĝ

ĝemelaj	adverboj	88 R. IV
	konjunkcioj	123
ĝentil-		424
ĝi		46; 47
ĝia	adjektivo	79
	pronomo	51
	dif. de ties	79

ĝis	<i>(morfologio)</i>	
	du-rola	24 R.
	kombinita	121; 191 (3); 195
	<i>(sintakso)</i>	
	ĉe numeraloj	87 (A)
	prep-o loka	190 (3); 191 (3)
	dativa	211 (7)
	loksuplementa	133 (F)
	mezur-indika	207
	proksimuma	207 R. II
	tempa	193 R. II; 195
	subjunkcio tempa	253
ĝis-		386
ĝis kiam		254 R.
ĝuste		90 R. V

H

haltostreko		14 (A)
-hava		361
havi por		268
hararo		333 R.
helpo de		206 (B)
helpverboj modaj	<i>(difino)</i>	96 R. I
	<i>(uzado)</i>	116 (d)
hibrida radik-uzado		296 (B)
ho		21 R. II; 125
horo	(espr. de)	87 (I)
huffero	(analizo de)	323 R. I

I

-i-		343 (C 6); 344
-i		99
ia		85
ial		88 (3)
iam		88 (2)
	dif. de foje	196 R. I
iama		88 (2)
-icio		362
-id		337
identiga stat-adjekto		197 (B)
identigo inversa		200 R. III
ideosprimo	(rimedoj de)	275
Ido		337 R.
ie		88

iel		88 (4)
ies		63
-if		414
i-finaĵo	en kunmetoj Vd. verbaj finaĵoj!	309 (4)
-ig	(<i>morfologio</i>) (<i>vortfarado</i>)	103; 119 (C) 358
igi	(modo post)	119 (C 1) 231 R. IV
-iĝ	(<i>morfologio</i>) (<i>vortfarado</i>)	104; 105; 119 (D) 359
iĝi		119 (D)
-i-ist		342 R. III
-ik		345; 362
-ik-ist		342 R. III
-il		323 R. II; 338
ili		46
ilia	adjektivo	79
	pronomo	51
imperfektaj tempoj	(<i>difino</i>) (<i>uzado</i>)	95 107 R.; 112 (1); 113
imperfekto		95 R.; 98; 109
	abstrakta	113 R. IV
implicita citaĵo		132 (II 6)
implikitaj kompletivoj		230 (4)
-in		32; 339
-ind		112 R.; 351
indefinitoj	Vd. nedifinaj pronomoj!	
indika prop-o		214
indikaj kompletivoj		231 (1)
indikativo	(<i>difino</i>) (<i>uzado</i>)	96 (1) 110 (1)
individuiga formo		52; 56; 60; 63
infinitiva	agprop-o	166
	cel-adjekto	186
	kaŭz-adjekto	208
	predikativo	169 (2 a)
	suplemento	
	de agsubstantivo	141
	de adjektivo	145
	de verbo	150 R. I
infinitivo	(<i>difino</i>) (<i>uzado</i>)	96 (2) 11; 117
	atribua predikativa	172

cel-adjekta	186
kun prep-o	117 (cc dd); 186
objekta	180-182
objektpredikativa	26; 172
ordona	166 R.
pasivsenca	155 R. II
postadjektiva	145
postsubstantiva	141
predikativa	169 (I d)
(subjekto de)	155
(supl-oj de)	151 (1)
post anstataŭ	117; 186
inter	117 (dd); 186
krom	117; 186
sen	117; 186
en dependaj demandoj	233 (III b); 236 (III)
in-formo	32
-ing	340
inkluziveco (espr. de)	199
inkoativo (<i>difino</i>)	98
(<i>uzado</i>)	105
ino	339 R. II
instiga adjekto	208 (3)
instrument-indikaj adjektoj	206
instrument-subprop-oj	264 (1)
(verbotempoj en)	264
inte	271 (noto)
inter	ablativa
koncerna	212
loka	210 (7)
proksimuma	189; 191
sendistinge elekta	207 R. II
tramova	133 (B) R.
kun infinitivo	191 (2)
kun elipsa rilatprop-o	117 (dd); 186 (2)
ĉe numeraloj	238 R. III
inter-	87 (A)
inter-	387; 430
interelementa grupiĝo	301
rilato	291
interjekcioj (<i>difino</i>)	24
(<i>detalo</i>)	125
interrogativoj	Vd. demandaj pronomoj!
interpozitivo	121; 185
interpunkcio (<i>difino</i>)	pĝ. 22
(<i>detalo</i>)	7-16

inter si		160 (II b); 163 (3)
interŝanĝ-adjekto		209 R. II
inversa vortefiko		304
	(klarigo de)	307
io		63
iom		71; 72 R.; 88 (5)
ioma		84 R. II
iom da		84 R. I
-ir		434
-ism		341
-ism-ist		336 R. II
-ist		342
	dif. de -ant kaj de -ul	342 R. IV
iŝi		46 R. I
-it		346
-ita	(uzado)	114
	(aktiviga valoro de)	119 (B) R.
-itat		362
iterativo	(difino)	98
	(uzado)	108
iu	adjektivo	85
	pronomo	63
	ĉiam triapersona	160 (I)
iu ajn		63 R. II
-iv		349 (2); 354; 362
iufoje		196 R. II
-iz		358 (3 d); 360

J

-j		33
ja	akcenta	91 (C); 223; 274 (1)
	klariga	225
	konceda	223 (2)
	(vortordo)	273 (3)
jam		90; 112 (2)
	en tempoprop-oj	247-248
	anst. ekde	194 R.
jam ne		90 R. XI
je	baza ligilo	144
	ĉe komparativo	71 R.; 144 (b 1); 207
	simbolo de prepozitivo	34
	analizilo	294
	ablativa	212 (3)
	ablativ-objekta	179 (3 a)

	ag-objekta	136
	instrument-indika	206
	koncerna	210 (8)
	mezur-indika	71 R.
	rezulta	204 R.
	temp-adjekta	193
	traktativa	179 R. III
je-		388
jen		55; 90
jen... jen...		55; 222 (5)
jena, jeno		55 R. II, III
jes		91 (II); 217
ju... des...		123; 262 (A 6), (B 6)
jun-		424

J

ĵus		90; 100; 271 (a)
ĵus kiam		248

K

kaj		123
kaj... kaj...		123; 221
karakteriziloj		26
kategoria divido		282
	(historio kaj pravigo)	284
kategorioj gramatikaj		24; 278
kategorio-sufiksoidoj		325-330
	ilia analogeco	331
kaŭzaj	adjektoj	208
	infinitivaj	208
	subprop-oj	267
	(verbotempoj en)	271 (10)
kaŭze de		208
kaŭzi	(modo post)	231 R. IV
	(tempo post)	270 R. 2
kazo	(<i>morfologio</i>)	34
	(<i>sintakso</i>)	
	ĉe subprop-oj komparaj	263
	koncedaj	258
	supozaj	257
ke	Vd. eksplikaj subprop-oj!	
	anst. ĉar	267 R. V
	por ke	268
	motivanta	267 R. V

	(elipso de)	219 (2); 232 R. II; 233 R. I
	(en tempoprop-oj)	250
ke kvazaŭ		230 R. I
kelk-		425 II
kelka		84
	en kunmeto	305 (3)
kelkaj	adjektivo	84
	pronomo	62
kelke		27 R. II
kelke da		84
kia		58 (C); 262,3
kial		88 (3) R. V
kiam		88 (2); 246; 247
	ĉe kazo reala	257 (I)
	anst. per tio ke	264 R.
kiamaniere		82
kie		88 (1)
kiel		88 (4)
	agokompara	262
	identiga	200; 262 (7)
	ilustra	200 R. III
	inform-indika	261
	komparativa	71
	kondiĉa	175 R. II; 201; 256
	kvalifika	200 (A c)
	kvalitkompara	175 R. I; 262
	manierkompara	262
	rezulta	204
	stat-indika	200; 256
	taksa	200 R. III
	anst. kvazaŭ	88 R. VI; 263 (3)
	ĉe nereкта predikativo	175
	(kazo post)	175; 262 R. I
	(refleksivo post)	161 R. I
kiel ankaŭ		221
kiel do		266 (3 c)
kiel eble plej		88 (5)
kiel longe		254
kiel se		88 R. VI; 263 (2); 263 R. IV
kiel... tiel ankaŭ		221 (II)
kiela		82 R. II
kies		56-57
	entenas difinitecon	56 R. II
	(vortordo)	273 II (1)

kio	<i>(formo)</i>	56
	<i>(uzado)</i>	58; 59
	absoluta	187 R. I
	(pseŭdosubprop-a)	226
kio estas, ke		267 R. V
kiom		88
	ekkria	71
	kompara	262 (A 5)
	(refleksivo post)	161 R. I
	striktiga	261
kioma		84 R. II
kiom da		84 R. I, R. III
kiom eble		88 (5)
kiomfoje		246
kiom-malsano		262 (I A)
kiom pli		71
kiu	<i>(formo)</i>	56
	demanda adjektivo	82
	pronomo	59
	pseŭdosubprop-a	226
	rilata adjektivo	81
	pronomo	56-58
kiu ajn		63 R. II
klarigaj prop-oj		225
klarigaj-adversaj prop-oj		225
klopodi	(modo post)	231 (2 g)
klopodo	(modo post)	240 R. II
kolektivoj	Vd. sumigpronomoj!	
kolektiv-adjektivoj		83
kolektivado	(espr. de)	33 (C)
kolektivigo		87 (E)
komenca aspekto	Vd. inkoativo!	
komencaj temp-adjektoj		194
komo		9
komparacio absoluta		70
	relativa	71; 72 R.
	ĉe adjektivoj	69-73
	ĉe adverboj	89; 92
komparaj	subprop-oj	262; 263
	(verbotempoj en)	271 (7)
komparativo	de adjektivo	71-72
	de adverbo	89; 92
komparo	indika	262 (I)
	disgradiga	262 (I B)

samgradiga	262 (I A)
supoza	263
kompleksa frazo	219
kompleksaj tempoj	100; 112
evitindaj	247 R. IV; 257 (I 3); 271 (3); 271 R. II, III
komplementita prop-o	218 (2)
komplemento	25
kompletigaj lingvoelementoj	277
kompletigendaj lingvoelementoj	277
kompletivoj	229-236
celaj	231 (2)
demandaj	230 (3)
eksplikaj	230 (2)
implikitaj	230 (4)
indikaj	231 (1)
rilataj	230 (1)
supozaj	231 (3)
komunaj nomoj (<i>difino</i>)	28
(<i>studo</i>)	29-35
komunaj tempoj	99
konatiĝi (analizo de)	105 R. I
koncedaj adjektoj	202
subprop-oj	258
(verbotempoj en)	271 (5)
koncern-adjektoj	210-212
koncerna prefiksoido	399
subprop-o	235
koncerne	122 R.
kondicionala participo	99 R. III; 101 R. II; 257 (I)
kondicionalo (<i>difino</i>)	96 (1)
(<i>uzado</i>)	116 (b)
ĉe konced-adjektoj	118; 183 (II); 202 R.
ĉe kondiĉ-adjektoj	118; 183 (II)
ĉe separativ-adjektoj	199
ĉe situaci-adjektoj	198
ĉe societaj adjektoj	198
en cel-adjektaj subprop-oj	268
en epitetprop-oj	239; 240 (c)
en indikaj prop-oj	214
en klarig-adversaj prop-oj	226
en kompletivoj	231 (3)
en koncedaj subprop-oj	258
en konsekvencaj subprop-oj	265
en nerekt-objektaj subprop-oj	235 (I); (III)

	en objektaj subprop-oj	233 (I), (III)
	en posttempaj subprop-oj	248
	en predikativaj subprop-oj	236 (I), (III)
	en separativaj subprop-oj	255 (B I); 271 (3)
	en subjektaj subprop-oj	232
	en supozaj subprop-oj	257
	post anstataŭ ke	255 (B I)
	kvazaŭ	257 (4); 263 (3)
	sen (tio) ke	255 (B I)
kondiĉaj	adjektoj	201
	subprop-oj Vd. supozaj!	
kondiĉe ke		257 (I 3)
konjugacio	(<i>difino</i>)	94
	(<i>formoj</i>)	99-101
konjunkcioj	(<i>difino</i>)	24
	(<i>studo</i>)	123
konkludaj	prop-oj	224
konkretigo de radiko		282 B, C; 330 (3)
konsekvenc-subprop-oj		265
	(verbotempoj en)	271 (9)
konsili	(modo post)	231 (2 B kaj R. VI)
konsilo	(modo post)	240 (2)
konsisti en, el		200 (a, b); 210 R. II
konsonantoj		17; 22
	duoblaj	6; 22 R. V
kontraŭ	ablativ-objekta	179 R. V
	agsuplementa	136
	almova	190-191
	dativa	211
	diferenc-esprima	210 (4)
	interŝanĝa	209 (3)
	koncerna	210 (4)
	loksuplementa	133 (F)
	pozicia	189
	tramova	190-191
	kun akuzativo	192
	ligilo de adjektivsuplemento	144
kontraŭ-		389; 430
kopulaj	prop-oj	221
kopulo	(<i>difino</i>)	26; 119 (A)
	(<i>studo</i>)	170
korpoparto (espr. de la tenata)		206 R. I
kovrilo		338 (noto); 436
krampoj		16 (2)

kredi	(modo post)	233 (I)
	(prep-o post)	177 (3)
kri-signo		12
kritiko de la E-a vortsistemo		432-436
krom	separativa	199
	(akuzativo post)	255 (B)
	(infinitivo post)	117
krom-		390; 430
krome		221
krom se		257 (II)
krom (tio), ke		255 (B)
krud-		424
kun	dativa	211 R. I
	instrumenta	206 R. III
	kondiĉa	201 R. II
	maniera	205 (b)
	priskribsuplementa	133 (E)
	reciprokeca	211 (4)
	societa	185
	societsuplementa	133 (E)
	stat-indika	200 (B)
	traktativa	210 R. III
	ĉe faktitivo	119 (C) R. II
	evitinda	210 R. III; 211 R. I
	gramatika ilo	185 R. III
	ligilo de adjektivsuplemento	144
	kombino kun prep-oj	122
kun-		391; 430
kune kun		198
kunfandita frazo		218 R. III
kunigaj krampoj		16 (2)
kunkun		391 R. I
kunmeta esprimo de supl-oj		134
	de ideoj	275
kunmetado		287-407
kunmeto de vortoj	duelementaj	288
	trielementaj	301
	pli-ol-trielementaj	308
kunorditaj prop-oj		220-227
kuntenaj	flankelementoj	302
	(sintezo de)	318
kuntirita frazo		218 (3)
kuŝiĝi		105
	(kazo post)	192 (2)
kutimiĝi		235 (I b)

kvalifika adjektivo	(<i>difino</i>)	67
	(<i>studo</i>)	68-74
kvalita determino		75
kvalitigo de radiko		282 BC
kvankam	adverbo	90
	subjunkcio	202 (A); 258
kvant-adjektivoj		84
kvantodifinaj pronom-adjektivoj		62
kvazaŭ	du-rola	89 R. I; 263 R. VI
	ĉe predikativo	175; 263 (3)
	ĉe kompletivoj	230 R. I
	ĉe participo	263 R. V
	ĉe supozaj komparoj	263
	anst. ke	230 R. I
	anst. kiel	263 R. IV
kvazaŭ-		424
kvazaŭnomoj (pronomoj)		41
kvazaŭsufiksoj		361
-kz-		4 R.

L

la		76-78
	ĉe komparativo	70 R.
	ĉe superlativo	73
	ĉe posedpronomoj	51 R.
	anst. posed-adjektivo	79 R. II
labialoj		22 (A)
landnomoj (ortografio)		36
	(esprimmaniero)	343-344
laringalo		22 (A)
laringovibro		22 (C) R. III
la... , kiu...		76 R. IV
la, kiuj		76 R. I
lasi		119 (C) (3)
	kun infinitiva supl.	155 R. II
latentaj	elementoj	305
	objektoj	177 R.
laŭ	kaŭza	208 (4)
	koncerna	210 (5)
	loka	190 R. I, II
	maniera	205
	tramova	190 (2); 191 (2)
	anst. kiel	261
laŭ-		392

laŭlonge de		190
laŭ tio, ĉu aŭ kiel		124 R. II
laŭtlegi (analizo)		293 R. II
leterskribi (analizo)		306 R.
li		46-47
lia	adjektivo	79
	pronomo	51
liber-		424
libroj-rimeno (analizo)		309 R. I
ligita vortordo		273
likvidoj		22 (B)
lingvoelementoj	Vd. elementoj!	
literoj	grekaj	5
	latinaj ne-E-aj	4
	(nomado de)	2
lo		125 R. II
-logio		324 R. III; 362
lok-adjektoj		189-192
lokaj	subprop-oj	244
	(verbotempoj en)	271 (2)
loki	(kazo post)	192 (2)
longo	de silabo	19
	de vokalo	20
lumigi		379 (noto)
lumizi		379 (noto)

M

majfloro (signifo de)		436 (d)
majusklo		39; 40 R.
mal-		420
malantaŭ		120
malbel-		424
malbon-		424
malĉi		54 R. IV
maldekstra	flankelemento	301 NB
maldifina	determino	75
male	klarig-adversa	225
malebligi (modo post)		231 (2 A)
male ke		266 (3 C)
malgrand-		424
malgraŭ	konceda	202
	priskribsuplementa	133 (E)
malgraŭ-		393
malgraŭ tio, ke		258

malhavi		420 R. I
malhelpi	(modo post)	231 (2 B), R. V
malhelpo	(modo post)	240 (b 2)
mallongo	de silabo	19
	de vokalo	20
malmulta		84
malmultaj	adjektivo	84
	pronomo	62
malmulte		84; 88 (C 5)
malpermesi	(modo post)	231 (2 B)
malpermeso	(modo post)	240 R. IV, V
malplej		73; 90
malpli		71
malpli ol du	(nombro post)	33 (B)
malproksima	(akuzativa supl. de)	144 (a)
malsama ol		146
malsamelementaj vortoj		279
malsuprenigi		309 (3)
malvasteco de vokalo		21
-maniera		361
manieraj adjektoj		205-207
manier-indikaj adjektoj		205
	subprop-oj	261
	(verbotempoj en)	271 (6)
manifestaj objektoj		177 R.
manke de		199
manki	(modo post)	231 R. III
manko	(prep-o post)	133 H R. II
marteligi	(analizo)	358
masklo		32 R.
mava		368
medialo	(difino)	97; 359 (3)
	(formo)	104
	(uzado)	119 (D)
mem		50; 90
	(vortordo)	50; 273 (4)
mem-		160 R. I; 310 (1)
memstareco de lingvoelementoj		277
memstariga vortefiko		306
meriti	(modo post)	231 R. III
metafora ideoesprimo		275
mez-		424
meze		72 R. II
mezur-indikaj adjektoj		207
mezuro	(espr. de)	133 (C c); 144 (b 1)

mezuriteco (espr. de)		133 (H)
mi		44
mia	adjektivo	79
	pronomo	51
	uzo aŭ neuzo ĉe vokativo	132 (III. R.)
minus		87 (G); 123 R. II
mir-		424 R.
mis-		368; 424
	dif. de fuŝ-	427
misa		368
modaj helpverboj	(<i>difino</i>)	96 R. I
	(<i>uzado</i>)	116 (d)
modalaj	adjektoj	205-209
	subprop-oj	260-268
modaloj	(<i>difino</i>)	93; 96
	(<i>uzado</i>)	116-118
modoj	(<i>difino</i>)	93; 96
	(<i>formoj</i>)	99-104
	(<i>uzado</i>)	116-118
mol-		424
momenta aspekto	Vd. momentaneo!	
momentaneo	(<i>difino</i>)	98
	(<i>uzado</i>)	106
monero		335 R.
montraj	adjektivoj	80
	pronomoj	52-53
morfologio	(<i>difino</i>)	pg. 22
	(<i>detalo</i>)	23-126
moŝto		128 R. IV
motiva	adjekto	208 (2)
movaj lok-adjektoj		190-192
multa		84
multaj	adjektivo	84
	pronomo	62
multe	ĉe komparativo	71
	ĉe superlativo	73
multe-		309 (3)
multe da		84
multipliko		87 (C) (G)

N

nazaloj		22 (B)
ne		91
	(<i>vortordo</i>)	91; 273 (4)

ne-		428
neaj	adjektivoj	85
	pronomoj	65
neasimilitaj	propraj nomoj	37
necesi	(modo post)	231 (2 B)
neceso	(modo post)	240 R. III
neceso kaj sufiĉo	(principo de)	285
nedifina	artikolo	85 R. I
	determino	75
nedifinaj	adjektivoj	85
	numeraloj	84
	pronomoj	63-64
neeble	(modo post)	232 (I b)
nefermita	silabo	21
negi		436 (c)
negacio		91 (A)
	duobla	91 (B)
negativoj	Vd. neaj pronomoj!	
negativeco		65
neĝas		164 R. II
ne... jam...		90 R. IV
nek		85 R. III; 91 R. III
	erare uzata	85 R. III
nek... nek...		221
ne malhelpi	(modo post)	231 R. V
nen		91 II (B)
nenia		85
nenial		88 (3)
neniam		85 R. III; 88 (2)
nenie		88
neniel		88 (4)
nenies		65
neniigi		65 R.
nenio		65
neniom		88
nenioma		84 R. II
neniom da		84 R. I
neniu	adjektivo	85
	pronomo	65
nenormalaj	agprop-oj	166-167
ne nur... sed ankaŭ...		221
ne nur... sed eĉ...		223 (4)
ne pli ol	du-senca	262 R. VI
nerekta	komplemento	25
	parolo	234

nerektaj	adjektoj	185
	infinitivaj adjektoj	186 (2)
	objektoj	179
	predikativoj	169 (1 c) (2)
nesimetriaĵoj		
	ĉe la tabelpronomoj	66
	ĉe la tabel-adverboj	85; 88 R. I, VIII; 88 (4)
	ĉe la loko de la negacio	91 R. I
	ĉe la tempaj subjunkcioj	248 R. I
neŝanĝebleco de elementoj		276
netransitivaj verboj		119
ne unu		85 R. III
neŭtra formo		42; 56; 60; 63
n-finajo	(<i>morfologio</i>)	34
	(<i>vortfarado</i>)	309
ni		44
nia	adjektivo	77
	pronomo	51
-nj		276; 415
nombra	adjektivo	86
	tem-adjekto	196
nombro gramatika		33
nome		131
nom-esprimo		132 (I)
nomi		110 R. III
nomigi		119 (B); 359 R. II
nominacio	(<i>difino</i>)	129
	(<i>studo</i>)	132
nominativaj adjektoj		187
nominativo	(<i>formo</i>)	34
	(<i>uzado</i>)	153; 154
	ĉe adjektoj	187
	ĉe predikativo	171
	ĉe nereкта predikativo	175
nomoj de parenceco	(artikolo ĉe)	76 R. VII
nomsupl-o		133 (A) R.; 133 (B) R. II
nomumi		413 (2)
nord-		424
nov-		424
nu	adversa	233 (2)
	akcenta	217
nul		85 (noto); 86
nula signo		32; 34; 132; 171
nulo		86

numeraloj	<i>(difino)</i>	24
	<i>(detalo)</i>	86-87
nun ke		250
nuntempo		329 R. V
nuntempo	<i>(konjugacio)</i>	95
	<i>(valoroj de)</i>	115 (1)
nur		90
	<i>(vortordo)</i>	90; 273 (4)
nura		90 R. VII

O

o	<i>(morfologio)</i>	29; 34 R. II
	<i>(vortfarado)</i>	277
	vort-interna	309
objekta	epiteto	174
	predikativo	173-175
	subprop-o	233
objekto	<i>(difino)</i>	25; 176
	<i>(sintakso)</i>	176-182
	ablativa	179 (3)
	dativa	179 (2)
	infinitiva	180-182
	latentata	119 (A); 177 R.
	manifesta	177 R.
	nerekta	176; 179; 182
	okaza	177 R.
	prepozitiva	176 R. I
	rekta	176; 178; 181
	substantiva	176; 179
	traktativa	179 (1)
objektoj	alternaj	177 (2)
	diversaj	177 (3)
	fiksaj	177 (1)
-obl		87 (C)
	dif. de -foj	87 (C) R. II
o-finaĵaj vortoj	(analizo)	314
o-finaĵo	<i>(morfologio)</i>	29; 34 R. II
	<i>(vortfarado)</i>	280 (1); 293
	elasta senco	286 (1); 293
	elizio	20 R. III; 29; 277 R. II
	propra signifo	280
	vort-interna	309 (1)
-oid		355

okazi	(modo post)	231 R. VIII
	(tempo post)	270 R. I
okaziga adjekto		208 (1)
okcident-		424
okulvitroj		33 (B 2)
ol	ĉe disgradiga komparo	262 (B)
	ĉe komparativo	71
ol ke		266 (3); 268 R. III
ol kia, ol kiam		262 R. V
ol se		263 (1)
olim		193 R. III
-ologi		362
-on-		87 (D)
	proponita parelemento	434 (B)
oni		48
onia		51
onomatopeoj		126
-ont		112 R.; 327
onteco	Vd. futuro!	
-op		87 (B); 435 R. I
ordaj numeraloj		87 (B)
ordona prop-o		216
ordoni	(kun infinitiva supl.)	155 R. I
	(modo post)	231 (2 B)
ordono	(modo post)	240 R. III
orient-		424
originaj	adjektoj	203
	subprop-oj	259
-or-		362
ortografio	<i>(difino)</i>	pg. 20
	<i>(reguloj)</i>	1-6
-ot-		327
-oz		356

P

palataloj		22 (A)
parelementoj		281; 434-435
parentezo		16 (2) R. I; 132 (II) R. I
parol-elementoj		23; 27
parolo	nerekta	234
	rekta	227
partecaj demandoj		217 (2); 230 (3)

particip-adverbo		158; 183 (II); 183 R. I, II.
	epiteta	183 R. I
	kaŭz-adjekta	267
	konceda	258
	maniera	261
	supoza	257
	tempa	249
	anst. sen ke	255 (B)
participaj finaĵoj en vortfarado		327
participo	<i>(difino)</i>	96 (3)
	<i>(uzado)</i>	118
	absoluta	183 (II); 249
	adjekta	158; 183 R. III
	epiteta	158
	predikativa	158
	dif. de adverbo	183 R. III
	suplementoj de <i>(vortfarado)</i>	150 (2)
	substantiva pluformado	128 R. II; 327
partikulo		278 (4); 293 F
paseo		95; 329 R. V
	Vd. preterito!	
pasivaj	participoj (resumo)	114
	sinteza formo	102
pasivo	<i>(difino)</i>	97
	<i>(formoj)</i>	101
	<i>(uzado)</i>	119
per	instrumenta	206
	maniera	205
	mezura	207
	privoka	206 (c)
	ĉe faktitivo	119
	ĉe medialo	119
	dif. de de	208 R. I
	erare uzata	138
per-		109 R. V; 394
perdo	(prep-o post)	133 H R. II
pere de		206; 264
perfekta aspekto		109 R. V
perfektaj tempoj	<i>(difino)</i>	95
	<i>(uzado)</i>	112 (2); 114
perfektivo	<i>(difino)</i>	98
	<i>(uzado)</i>	109
peri-		431
permesi	(modo post)	231 (2)

permeso (modo post)	240 R. IV
per si mem	160 (II)
personpronomoj Vd. personaloj!	
personaloj (<i>morfologio</i>)	43-46; 48; 49
(<i>uzado</i>)	47
personigita afero (sekso de)	36 R. III
(reprezentanto de)	47
persono dua	45
tria	46-49
unua	44
per tio ke	264
peti (modo post)	231 (2)
peto (modo post)	240 R. II
plaĉi (modo post)	231 R. III
plat-	424
plej	73; 90; 92 R. VII, VIII
pleja	90 R. VIII
plen-	424
-plena	361
pleonasma finaĵo	279
prepozicio	213
pli	71; 72; 90
pliampleksiĝo de la refleksivo	162
plie	90 R. IX
pli-malpli	300
pli ol unu (kazo post)	178 R. II
(nombro post)	33 (B)
plozivoj	22 (B)
plu, plue	90 R. X-XII; 182 R. II
(<i>vortordo</i>)	273 (6)
pluformado finaja	281
plur-	309 (3)
pluraj adjektivo	84
pronomo	62
pluraliga vortefiko	304 R. II
pluralo	33
interne de kunmeto	309 R. I
plus	87 (G); 123 R. II
pluskvamperfekto	113 R. II
pluvas	164 (2)
po	87 (A, F); 133 (I); 207 (B)
po-	87 (F) R. III; 395
popolnomoj (skribo de)	39 (b)

por	absoluta	268
	cela	209
	dativa	211
	destineca	209 (4)
	interŝanĝa	209 R. II
	koncernsuplementa	133 (D)
	ligilo de adjektivsopl.	144
	ligilo de infinitiva supl.	141 R.
	objektsuplementa	136
	preza	209
	profita	209 (3)
	tempa	193 (II)
	anst. kiel	175; 200 (A c); 209 R. III
	antaŭ infinitivo	117; 141 R.; 268
	antaŭ nereakta predikativo	175
	dif. de pro	208 R. III
por-		396
por ĉiam, por eterne		193
por ke		268
posedaj	adjektivoj	79
	pronomoj	51
posesivoj	Vd. posedaj pronomoj!	
post	hor-esprima	87 (I b)
	loka	189; 191
	tempa	193
post-		397; 430
post kiam		247
post ol		117; 124; 247
posttempaj	subprop-oj	248
postuli	(modo post)	231
postulo	(modo post)	240 R. II
potencigo	(espr. de)	87 (G)
-pova		361
povi	(signifo laŭ la modo)	116 R. I
	(specialaj karakteroj de)	116 (D)
	en kunmeto	309 (4)
poziciaj lok-adjektoj		189
pra-		421
pre-		407
predikativa	subprop-o	236
predikativo	(<i>difino</i>)	26
	(<i>studo</i>)	169-175
	de la objekto	171-175
	de la subjekto	169
	adjekta	170 (4); 197 R.; 200 R. II

	adjektiva	169 (I a)
	adverba	169 R. I, II
	infinitiva	169 (I d)
	nerekta	175
	prepozitiva	169 (I c); 175 R. II, III
	rekta	173
	substantiva	169 (I b)
	dif. de adverbo	170 R. II; 172 R. II
predikato	(<i>difino</i>)	25; 152
	(<i>studo</i>)	165-175
	neverba	165 R.
prediktaj tempoj	(<i>difino</i>)	95
	(<i>uzado</i>)	110; 112 (3)
prefiksigo	de prep-oj	430
	de radikoj	276 R.; 423
prefiksoidoj	(<i>difino</i>)	276; 363
	(<i>divido</i>)	364
	adverbaj	365-370
	prepoziciaj	373-406
	pseŭdaj	407
	radikaj	371-372
prefiksoj	(<i>difino</i>)	276 (2)
	prepoziciaj	430
	radikaj	424
	veraj	416-422
prepoziciaĵoj		122
prepozicioj	(<i>difino</i>)	24; 218 N.B.
	(<i>detalo</i>)	120
	antaŭ adverbo	120 R. II
	post agsubstantivo	136
	post verboj	179; 182
prepozitiva adjekto		185
	objekto	179; 182
	predikativo	169 (I c)
	supl-o de adjektivo	144 (b)
	de adsubstantivo	135-138
	de adverbo	148
	de aĵsubstantivo	133-134
	de verbo	150
prepozitivo	(<i>difino</i>)	34 R.
	(<i>studo</i>)	121; 185
	duopa	121; 185
preskaŭ		89
	tempa	248 R. IV
preskaŭ-		424

preter		191; 192
preter-		398
preterito	<i>(difino)</i>	95
	<i>(uzado)</i>	115 (2)
prezenco	<i>(difino)</i>	95
	<i>(uzado)</i>	115
	administracia	115 (1)
	citaja	115 (1)
	eterna	115 (1)
	historia	115 (1)
prezo	(espr. de)	209 R. II
pri	dativa	211 (c)
	koncern-adjekta	210
	koncern-objekta	136
	koncernsuplementa	133 (D)
	traktativa	179 (I); 210
	ligilo de adjektivsupl.	144
pri-		399
prilumi		399 (noto)
primitiva prop-o		210 (1)
pri-objekto		179 (1)
pri tio, ke		235 (I); 267 R. V
privokado		206 (C)
pro	interŝanĝa	209 R. II
	kaŭza	208 (1)
	motiva	208 (2)
	privoka	208 R. IV
	anst. anstataŭ	199 R. II
	pro aŭ por	208 R. III
pro-		400
produkto-verboj		137; 228 (2 a)
pro ke		267 R. I
proksimuma	kvanto (espr. de)	207 R. I
	tempo (espr. de)	193-195
proksimume		207 R. II; 425 II R. II
pronom-adjektivoj	<i>(difino)</i>	41
	<i>(studo)</i>	79-85
pronomoj	<i>(difino)</i>	24
	<i>(detalo)</i>	41-66
	demandaj	59
	kolektivaj	60-62
	montraj	52-53
	nedifinaj	63-64
	negativaj	65
	personaj	43-50

	posedaj	51
	rilativaj	56-58
prononco	(resumaj reguloj)	21
proponi	(modo post)	231 (2 B); 239 (c)
propono	(modo post)	240 R. II
proporcio	(espr. de)	87 (G)
propozicia	suplemento	
	de adjektivo	146
	de adverbo	149
	de substantivo	142
	de verbo	150
propozicio	(<i>difino</i>)	24; 151; 218 NB
	(<i>strukturo</i>)	165-175
propozicioj		
	adversaj	223
	ag-esprimaj	165-167
	alternativaj	222
	apudmetitaj	219
	demandaj	217
	deziraj	215
	ec-esprimaj	168-175
	ekkriaj	214 R. I; 215 (B)
	elipsaj	219 R. II
	indikaj	214
	klarigaj	225
	klarigaj-adversaj	225
	komplementitaj	218 (2)
	konkludaj	224
	kopulaj	221
	kunorditaj	219
	ordonaj	216
	primitivaj	218 (1)
	protestaj	223 (4); 266 (3 c)
	sensubjektaj	164
	suborditaj	219
	(specoj de)	214-218
propozicio-sintakso	(<i>difino</i>)	pĝ. 179
	(<i>studo</i>)	151-218
propra signifo de finaĵo		280
propraj nomoj	(<i>difino</i>)	28
	(<i>studo</i>)	6; 36-40
propre		92 R. III
protestaj prop-oj		223 (4); 266 (3 c)
provincnomoj		343 (D)
pruve		225

pseŭdo-	422
pseŭdoadverboj	87 (A) R. I
pseŭdopleonasma finaĵo	306
pseŭdoprefiksoidoj	407
pseŭdoprefiksoj	431
pseŭdosubprop-oj	226
pseŭdosufiksoidoj	362
punkto	8
punktokomo	10
purigo (analizo)	311. II

R

rab-	424 R.
radikkarakteroj	278
radikoj (<i>difino</i>)	276 (2)
(karakteroj de)	278
(kategoria divido)	282
(ties pravigo)	284
dif. de sufiksoj	322 R.
prefiksoidoj	371; 372
rajto (modo post)	240 b 2
rapid-	424
rapidmezurilo (analizo)	304 R. I
re	90 R. I; 277 R. I
re- (<i>morfologio</i>)	108
(<i>vortfarado</i>)	369
reciproke	163 (2)
reciprokeco	163
reciti	369 R. II
reen	192 R. II; 369
refleksiva voĉo	119 (D)
refleksivo	160-162
rekta komplemento	25
parolo	227
rektaj adjektoj	184
objektoj	178
predikativoj	169 (2); 173 (I)
relativa tempodifino	193 (2)
relativaj verbotempoj	270
reliefigo de frazelementoj	274
renkonte	192 R. II
renkonte al	190 (A 3)
renversebleco (principo de)	433

reprezentantoj	41
de la subjekto	159
reprezentato	41; 56
(ellaso de)	232 (II)
responda	144 R. I
respondo forma inter pronomoj	66; 85
resuma apudmeto	130
ekvivalento	131
resumo de la uzo de <i>ata/ita</i>	114 (fino)
de la vortfarado	311
reteni	369 R. II
retro	370
returne	192 R. II
retuŝi	369 R. II
reveneblajo (analizo)	323
rezultaj adjektoj	204
subprop-oj	259
rezulti (modo post)	231 R. IV
rezultigi (modo post)	270 R. 2)
-riĉa	361
rilataj tempoj	95
rilataj Vd. <i>rilativaj!</i>	
rilatato	197
rilate	122 R.
rilatiga stat-adjekto	197; 200-204
rilativaj adjektivoj	81
pronomoj	56-58
subprop-oj	230 (1)
epitetaj	238
instrumentaj	264 (2)
kompletivaj	230 (1)
manier-indikaj	261 (2)
objektaj	233 (II)
originaj	259 (2)
predikativaj	236 (II)
pseŭdaj	226
rezultaj	259 (2)
separativaj	255 (B II)
societaj	255 (A)
subjektaj	232 (II)
(verbotempoj en)	271 (1)
rilativoj Vd. <i>rilativaj pronomoj!</i>	
rilatpronomoj Vd. <i>rilativaj!</i>	
rilatverboj	328 (2 d)
ripeta aspekto Vd. <i>iterativo!</i>	

S

sakroj		125 R. I
sam-		424
same		92 R. IV
samelementaj vortoj		279
samtempaj tempoprop-oj		246
sankt-		424 R. II
sat-		109
scias	(mi ne..., kiu)	233 R. VI
se	absoluta	183 R. II; 268
	demanda-motivanta	267 R. VI
	dezira	215
	elipsa	257 R. VII
	supoza	257
	tempa	246 (A)
	anst. ke	231 R. III; 232 (I c); 257
	ĉe kazo reala	257 (I)
	(infinitivo post)	268 R. I
	(volitivo post)	116 (C 3); 257 R. VII
sed		123; 223
sek-		424
sekso gramatika		32
sekve		224
semajntagoj (espr. de)		193 I (c)
sen		199
	kun infinitivo	117 R.
sen-		401
sendi	(infinitivo post)	155 R. I
senforta	(analizo)	304; 311
sensubjektaj prop-oj		164
sen tio		225
sen (tio) ke		255 (B)
senutila	(analizo)	304 R. III
senvoĉeco		22 (c)
separativaj	adjektoj	199
	subprop-oj	255
	(verbotempoj en)	271 (3)
serĉi	(modo post)	239 (c)
si	(<i>morfologio</i>)	49
	(<i>sintakso</i>)	160-163
	substantive uzata	160 R. II
sia	(<i>morfologio</i>)	49
	(<i>sintakso</i>)	160-163
sia-		160 R. I; 310

siaflanke		223 (I)
siatempe		160 (II b)
siavice		223 (I)
sidiĝi		105 R. III
	(kazo post)	192 (2)
signifas	(kazo post)	132 (2) R. II
silabado		14 (B II); 21
silaboj	fermitaj, nefermitaj	21
	longaj, mallongaj	19
-simila		361
simplaj tempoj		99; 110
sin-	<i>(sintakso)</i>	160 R. I
	<i>(vortfarado)</i>	310 (1)
sinetio	<i>(difino)</i>	pĝ. 22
singularo		33
sintaksa vortefiko		309 (4)
sintakso	<i>(difino)</i>	pĝ. 184
	de la vorto	127-150
	de la prop-o	151-218
	de la frazo	219-274
sintezo	(kontraste al sintakso)	290
	(kontraste al analizo)	317-320
situaciaj	adjektoj	198-202
societaj	adjektoj	198
	subprop-oj	255
skemo de analizo		313
sol-		424
sola		197 R.
sole		90 R. VI; 197 R.
soleca		329 (IV 2)
solstarivaj lingvoelementoj		277
sonoj kaj literoj		17
sovag-		424
specoj	de vortoj	24
	de prop-oj	214-218
spiritfunkciaj verboj		328 (2 f)
spite		92 R. VI
spite de		202 B (c)
spite ke		258
stariĝi		105 R. III
'stas		277
stataj	adjektoj	197-204
	subprop-oj	255-259
	verbotempoj	114 (2 a)
stati		114 R. I

stat-indikaj adjektoj	200
statverboj	119 (A); 328 (2 b)
steleto	16 (3)
stif-	425 R.
streĉado de formoj	320
strukturaj frazelementoj	27
strukturo de la prop-o	152-213
sub	
kaŭza	208 (4)
loka	189-192
loksuplementa	133 (F)
priskribsuplementa	133 (E)
stat-indika	200 (B)
tramova	191
sub-	402; 430
subjektaj subprop-oj	232
subjekto	
(<i>difino</i>)	25; 152; 153
(<i>sintakso</i>)	153-159
de adjektivo	156
de nepredikata verbo	155
de predikata verbo	154
de agsubstantivo	156
neesprimita	99 R. I; 164
ne ripetita	154 R. II
dif. de aganto	153
subjunkcio	
(<i>difino</i>)	24
(<i>detalo</i>)	124
subjunktivo	231 (2) (noto)
suborditaj prop-oj	219 (2)
subprop-o	219 (2)
subprop-oj	
adjektaj	243-268
duagradaj	219 (2 c)
celaj	260
efikecaj	231 (2 b)
elipsaj	219 R. I, II
epitetaj	237-242
instrumentaj	264
kaŭzaj	267
komparaj	262-263
kompletivaj	229-236
koncedaj	258
konsekvencaj	265-266
lokaj	244
manieraj	261-266
manier-indikaj	261
modalaj	260-268

nerekt-objektaj	235
objektaj	233
originaj	259
predikativaj	236
rezultaj	259
separativaj	255 (B)
situaciaj	255-258
societaj	255 (A)
stat-indikaj	256
subjektaj	232
supozaj	257
supozaj-komparaj	263
stataj	255-259
tempaj	245-254
volaj	231 (2 a)
(verbotempoj en)	268-271
substantiva ĉefelemento	281-293
epiteto	129-132
predikativo	169 (1 b)
uzado de adjektivo	30; 36; 51; 74
de adverbo	30
de infinitivo	117
de pronomo	30
de io	53
de mi	44
de nenio	65
de oni	48
de si	160 R. II
de prop-o	30
substantivaj sufiksoidoj	292
(<i>detalo</i>)	332-346
substantivo (<i>difino</i>)	24; 278
(<i>morfologio</i>)	28-40
(<i>sintakso</i>)	128-142
(<i>vortfarado</i>)	278
subtraĥo (espr. de)	87 (G)
sud-	424
sufiĉe, por ke	72 R.; 268
sufiĉi (modo post)	231 R. III
sufiksoidoj (<i>difino</i>)	276; 322
adjektivaj	295; 347-356
kategoriaj	325-331
kvazaŭaj	361
participaj	327
pseŭdaj	362

	substantivaj	292; 332-346
	verbaj	298; 357-360
	(specialaĵoj de)	323
sufiksoj	(<i>difino</i>)	276 (2)
	veraj	409-415
	dif. de radikoj	322 R.
sumigaj	pronomoj	60-61
super	disting-elekta	133 (B) R. III
	koncerna	210 (6)
	loka	189-192
	loksuplementa	133 (F)
	mova	190
	objekta	136
	proksimuma	207 R. II
	tramova	191
	ĉe numeraloj	87 (A)
super-		403; 430
superlativo	de adjektivo	73
	de adverbo	92
supersigno		3
suplemento (<i>difino</i>)		25
	adjektiva	268
	adverba	143
	akuzativa	139; 144 (a)
	infinitiva	141; 145
	objekta	135-137
	prepozitiva	133; 135; 144 (b); 148
	subjekta	138
	ĉe adjektivo	143-146
	ĉe adverbo	147-149
	ĉe infinitivo	150 (1)
	ĉe komparativo	71-72; 89; 92; 146; 149
	ĉe participo	150 (2)
	ĉe substantivo	133-142
	ĉe superlativo	73; 144
	ĉe verbo	150
	de ad-substantivo	133-134
	de aĵ-substantivo	135-142
	de agosfero	133 (D)
	de destiniteco	133 (D)
	de distinga elekto	133 (B) R. III
	de distribuo	133 (I); 134 (I)
	de esenco	133 (C)
	de koncernateco	133 (D); 134 (D)
	de konsisto	133 (C); 134 (C)

	de loko	133 (F); 134 (F)
	de mezuriteco	133 (H); 134 (H)
	de mezuro	133 (C)
	de nomo	133 (A) R.; 133 (B) R. II
	de okupiĝo	133 (D)
	de origino	133 (B); 134 (B)
	de posedo	133 (A); 134 (A)
	de priskribo	133 (E); 134 (E)
	de sendistinga elekto	133 (B) R. III
	de tempo	133 (G); 134 (G)
	transformo en epiteton	134
supozaj	komparoj	263
	subprop-oj	257
	(verbotempoj en)	271 (4)
supoze ke		257
supozo	separativa	257 (II)
supreniĝi	(analizo)	309 (3)
sur	dativa	211 (7)
	instrumenta	206 (B)
	koncerna	210 (6)
	loka	189 (6)
	metafora	192
	tramova	190 (2)
	post superlativo	73
sur-		404

Ŝ

-ŝajna		361
ŝajnas	intermetita	164 (1); 214 R. II
	(infinitivo post)	168.1 d)
	(predikativo post)	169 (a), (d)
	(modo post)	230 (2)
ŝi		46-47
ŝia	adjektivo	79
	pronomo	51

T

tabel-adverboj		88
tabelo	de akcesoraj komplementoj	27 (II)
	de konsonantoj	22
	de pronom-adjektivoj	85
	de strukturaj frazelementoj	27 (I)
	de verbotempoj	99; 104
	de vokaloj	21

tabelvortoj		85
tagiĝas		164 (2)
tamen		90 R. III; 123; 223 (2)
t.e.	Vd. tio estas	
tempaj adjektoj		193-196
	aktualaj	193
	finaj	195
	komencaj	194
	nombraj	196
	subprop-oj	245-254
	respondaj al kiam?	246-251
	de kiam?	252
	ĝis kiam?	253
	kiel longe?	254
	(verbotempoj en)	271 (11)
tempoj	(difino)	93; 95
	(formoj)	99-101
	(uzado)	110-114
	absolutaj en subprop-oj	271
	kompleksaj	100; 110; 112-114
	relativaj en subprop-oj	270
	simplaj	99; 110
	stataj	114 (2 a)
	(valoro de)	115
tempopunkto	(espr. de)	193 (I)
terurigi		359 (1 c)
tia	adjektivo	80
	maŝateca	80 R. I
	pronomo	53 (C)
tia ke		265
tia... kiu...		80; 238
tial		88; 224
tial ke		267
tie		68 (1)
tiel		88 (4)
tiela		80 R. II; 88 (4)
tiel ke		265
	(modo post)	266
tiel longe dum aŭ kiel		254
ties	(formo)	52
	(uzado)	53 R. II; 79
ti-kiuj		76 R. I
timi	(modo post)	231 R. I
timo	(modo post)	240 R. VI

tio	<i>(morfologio)</i>	52
	<i>(uzado)</i>	53
	anst. ĝi	47
tio estas		131; 225
tiom		88 (5) R. VII
tioma		84 R. II
tiom da		84
tiom pli		70 (I d)
tiom pli... ju pli...		123
tiom pli ĉar		225
tiom pli ke		225
tiu	<i>(morfologio)</i>	52
	<i>(uzado)</i>	
	adjektivo	80
	pronomo	53
tiu... kiu...		238
tondras		164 (2)
tra	loka tramova	190-192
	loksuplementa	133 (F)
	tempa	193 (II)
	kombino kun prep-o	121
tra-	<i>(morfologio)</i>	109
	<i>(vortfarado)</i>	405
tra inter		121
traktativaj	adjektoj	210
	objektoj	179 (1)
tramovo		190-192
trans	lok-adjekta	189 (7)
	loksuplementa	133 (F)
	tramova	190; 191
trans-		406
transitivaj	verboj	119
tre		183 (I)
treete		72 R.
trigramoj		3
trion-		425
tripunkto		13
tro... ol ke, ... por ke		266 R. I; 268 R. III
trudi	(modo post)	231 (2 B)
trunko komuna de pruntvortoj		336 R. III
tuj		90
tuj kiam		247
tut-		109
tuta		83
tutecaj demandoj		217; 230 (3)

tute ne 85 R. III

U

-uj		343
-uk		372 R. II
-ul		330
	dif. de -ant, -ist	342 R. IV
ulo		330 R. IV
-um		413; 435
u-modo	Vd. volitivo!	
-unt		96 (3); 99 R. III; 327 R. I
-unte		257 (I 4)
unu	adjektivo	85
	nedifina artikolo	85 R. I
	numeralo	86
	pronomo	64
unuaeco		329 (V)
unueco		329 (VI)
unudirektaj verboj		177 (2 a)
unu la alian		163
urbnomoj		36; 343 R. III
us-modo	Vd. kondicionalo!	
-ut		96 (3); 101 R. II; 327 R. I

V

vaporŝip-asocio	(analizo)	301
vasteco de vokalo		21
ve		21
velaroj		22 (A)
vend-objekto	(espr. de)	209 R. II
vendoprezo	(espr. de)	209 R. II
VER.	(vortefikaj reguloj)	289
veraj	prefiksoj	416-422
	sufiksoj	409-415
verba ĉefelemento		297
verbaj finaĵoj		286 (3); 299
	(elasta senco)	286 (III)
	(memstara uzo)	277
	(propra senco)	280 (3)
	radikoj dif. de adjektivaj	283
	sufiksoidoj	298; 357-360
verbfinaĵaj vortoj	(analizo)	316

verbigoj	senpera	
	de adjektivo	299 (B)
	de substantivo	299 (A)
verbo	<i>(difino)</i>	24; 93; 278 (4)
	<i>(morfologio)</i>	93-119
	<i>(sintakso)</i>	151-218
	<i>(vortfarado)</i>	289 (III); 297
	(klasoj de)	328 (2); 358 (3)
	(kategorio de)	278
verboj	de ago	119 (A)
	de atribuado	173
	de daŭro kaj rezulto	110
	de daŭro sen rezulto	110; 113 R. II; 114
	de rezulto sen daŭro	110; 113 R. II; 114
	de sensado	172
	de stato	119 (A)
	altern-objektaj	177 (2)
	divers-objektaj	177 (3)
	dudirektaj	177 (2)
	fiks-objektaj	177 (1)
	hibridaj	110
	kopulaj	119 (A); 170
	tridirektaj	177 (2)
	unudirektaj	177 (2)
verbotempoj	en subprop-oj	269-271
verŝajne	(modo post)	232 (I b)
vesperas		164 (2)
vi		45
via	adjektivo	79
	pronomo	51
vic-		425 R.; 429
vic'al		120; 429 R.
vicmontraj	numeraloj	87 (B)
vicumi		413 (5)
vir-		32 (A); 372
viraj	nomoj	36
virg-		424
virinaj	nomoj	36; 339 R. I
virseksaj	nomoj	32 R.
vivipova		309 (4); 310 (2)
vizaĝaltere	(analizo)	308 (2)
voĉdoni	(analizo)	303
voĉeco	de konsonantoj	22 (C)

voĉoj	<i>(difino)</i>	93; 97; 119
	<i>(morfologio)</i>	99-104
	<i>(uzado)</i>	119 (A-D)
vokaloj		17
	(longeco de)	20
	(vasteco de)	21
vokativo		132 (III)
voli	(signifo laŭ la modo)	116 R. I
	specialaĵoj	116 (d)
	(modo post)	231 (B)
	(infinitivo post)	181 (1)
	(akuzativo post)	116 (D); 181 R.
	en kunmeto	309 (4)
volitivo	<i>(difino)</i>	96 (1)
	<i>(uzado)</i>	116 (C)
	en ĉefprop-oj	deziraj 215
		ordonaj 216
	en subprop-oj	celadjektaj 268
		epitetaj 240 (b)
		kompletivaj 231
		koncedaj 258 R.
		konsekvencaj 266
		objektaj 233 (I b), (III b)
		nerektaj 235 (I b), (III b)
		predikativaj 236
		subjektaj 232 (I b), (III b)
	post kondiĉe ke	357 R. IV
	post kvankam	258 R.
	post se	257 R. VII
	post tiel ke	266 (2)
volitivparticipo	aktiva	96 (3); 99 R. III
	pasiva	96 (3); 101 R. II
volo	(modo post)	240 R. II
vort-analizo	Vd. analizo!	
vortefikaj	reguloj	288-289
vortefiko	ag-objektiga	306 R.
	inversa	304
	memstariga	306
	pluraliga	304 R. II
	rekta	289 R. I
	sintaksa	309 (4)
vortfarado		275-431
	<i>(divido)</i>	275
	<i>(rola de)</i>	436
	Vd. vortsistemo!	

vortfunkcioj		25-27
vortkategorioj		278
vortkonsisto de la lingvo		276-286
vortkunmeto		287
	(analizo de)	313-316
	(sintezo de)	317-320
	esceptoj	310
	resumo	311
	skemoj	313
vorto	<i>(difino)</i>	23
	<i>(specoj de)</i>	24
	<i>(funkcioj de)</i>	25-27
vortordo		272-274
	de ne	91
	en citanta frazo	227
	post igi , lasi	233 R. III
	post aŭdi , vidi	233 R. II
vortotranĉo		14 (B II)
vortsintakso	<i>(difino)</i>	pĝ. 184
	<i>(studo)</i>	127-150
vortsistemo	(valoro de la)	433-435
Q		4
X		4
Y		4

II. INDEKSO DE LA REFERENCITAJ AŬTORNOMOJ

(La ciferoj signas la paĝojn)

Akademio de Esperanto	11, 15, 223, 225, 278, 383, 386, 387, 462
Albault André	368, 477, 524
Andersen Hans	7, 74
Antido	Vd Saussure
Aymonier Camille	9
Bailey William	11, 320
Banham F.R.	13
Bastien Louis	9
Beaufront Louis de	9, 104, 150, 453, 525
Bein Kazimir	15, 104, 113, 150, 176, 327, 525, 526
Belinfante F.J.	25, 27
Belmont Leo	11
Bennemann Paul	113, 510
Benvéniste Emile	15
Bleier Vilmos	15
Boirac Emile	325, 383, 409
Bokarev E.A.	66
Borovko N.A.	15, 120
Boulet Paul	507
Briquet Maurice	467
Butler M.C.	9, 11, 13
Cæsar Iulius	200
Capé Auguste	46
Carreiro-Neto	Vd Porto
Cart Théophile	384, 507
Chomsky Noam	14, 15, 16
Christaller Paul	11, 60, 510
Cicero M. Tullius	201
Clark Brendon	455
Corret Pierre	11, 104
Couturat Louis	383, 520
Couwenberg F.	16, 515
Cseh Andreo	45, 505
Ĉefec̆	Vd Höveler
Degenkamp G.J.	404
Dodge E.G.	11
Downes W.J.	13
Dresen Hilda	11

Drezen Ernest	11
Ellis John	386
Faulhaber F. A.F.	13, 404
Flaubert Gustave	134
Friis C.C.	14
Fruictier Paul	9, 474
Gasse Emile	26
Gill	384
Göhl Gustav	9
Grabowski Antoni	15, 34, 62, 103, 104, 110, 137, 227, 243, 266, 374, 404, 409, 420, 507
Grosjean-Maupin E.	9, 173, 203, 242, 507, 510, 525
Haugen E.A.	13
Hjelmslev L.T.	14
Hoog H.A. de	13, 120, 258, 342, 343, 368, 384, 395, 404, 405, 406, 407, 416
Hodler Hector	462
Höveler Herbert	43, 383, 384, 387
Inglada Vincente	11
Isbrücker J.R.G.	384, 404
Jakobson Roman	14
Jung Teo	9, 136, 362
Jürgensen H.	510
Kabe	Vd Bein
Kawasaki Naokazu	419
Kolowrat Georg	383
La Colla Stefano	14, 26
Lanti	95, 381
Lentaigne L.	16
Lingva Komitato	462, 481
Lippmann Walter	9, 113, 148, 263, 366
Loy Karl	510
Malmgren Ernfrid	507
Manders W.J.A.	13
Marko (Sankta)	134
Martinet André	15
Mateo (Sankta)	73
Meier Ludwig	15
Meillet Antoine	66
Migliorini Bruno	477
Millidge Edward	510

Minor Karl	384, 435, 490, 502, 510, 511
Mudie H.B.	86
Nakamura Tazuo	143, 346
Neergaard Paul	384, 476
Nylén Paul	384, 386
Ossaka Kenji	13, 128, 276
Panel G.	385, 386
Porto Carreiro-Neto L.	9
Privat Edmond	34, 404, 405
Pumpr Tomaš	11, 13, 62, 115
Renan Ernest	26
Rollet de Lisle M.	11, 12, 66, 384
Rossetti Reto	13, 175, 384, 385, 503
Rotkvič Ivo	404
Saussure René de	9, 95, 270, 383, 384, 387, 520
Schwartz Raymond	15, 136, 156, 221, 242, 253
Sentis Henri	476
Setälä Vilho	95, 113
Sirk Hugo	26
Sonnenfeld Ernest	136
Sós Edmund	505
Stamatiadis Anakreon	11, 405
Stojan Petro	385
Sturmer K.R.C.	503
Szemerényi O.	134
Takahaši Meguru	9
Török Peter	9
Trubetzkoy Nikolaj S.	14
Varankin Vladimir	9
Velten Mikael	9
Vilborg K.E.	237
Wells John	368
Wüster Eugen	9, 43, 65, 384, 402, 419, 521, 522, 524
Zamenhof Lidja	11
Zamenhof Lazaro	sur çiu paĝo

III. INDEKSO DE LA MALLONGIGOJ

A.	anglalingve
anst.	anstataŭ
(B)	Bein (Kabe)
bv.	bonvolu
ĉ.	ĉirkaŭ
D.	germanlingve
D-ro	Doktoro
E-a	Esperanta
ekz-e	ekzemple
eld.	eldono, eldonisto
Esp-o, E-o	Esperanto
F.	franclingve
G.	germanlingve
H.	hungarlingve
I.	itallingve
i.a.	inter aliaj
(K)	Fundamenta Krestomatio
k.a.	kaj aliaj
k.c.	kaj cetere
k.s.	kaj simile, kaj similaj
k. sekv.	kaj sekvantaj
Kp.	komparu
ktp.	kaj tiel plu
lin.	linio
l.c.	en la loko citita
NB	Notu bone
n-ro	numero
(OV)	Originala Verkaro de Zamenhof
pĝ.	paĝo
prep-o	prepozicio
prop-o	propozicio
(PV)	Plena Vortaro de SAT
(PIV)	Plena Ilustrita Vortaro de SAT
resp.	respektive
Rim.	rimarko
sk.	subkomprenu
s-ro	sinjoro
supl-o	suplemento
t.e.	tio estas
t.n.	tiel nomata
trad.	traduko, tradukinto
(UV)	Universala Vortaro (Fundamento)
Vd.	Vidu ĉe, sub...

(VER.)	Vortefika Regulo
vol.	volumo
Z.	Zamenhof
z	Ekzemplo de Zamenhof

IV. TABELO DE ENHAVO

(La ciferoj signas la paĝojn)

ANTAŬPAROLOJ	7-16
LA FUNDAMENTA GRAMATIKO	17-20

LA VORTO

I. ORTOGRAFIO KAJ INTERPUNKCIO	23
La ortografio	25
La interpunkcio	28
II. FONETIKO	37
Sonoj kaj literoj	39
Akcento	40
Silaboj	40
Longeco de vokaloj	40
Vasteco de vokaloj	42
Konsonantoj	47
III. MORFOLOGIO KAJ SINETIO	51
Vortospecoj kaj vortfunkcioj	53
La Substantivo	59
La komunaj nomoj	59
La propraj nomoj	63
La Pronomo	70
Personpronomoj	71
Posedpronomoj	76
Montraj pronomoj	77
Rilatpronomoj	81
Demandpronomoj	83
Sumigpronomoj	84
Nedifinaj pronomoj	86
Neaj pronomoj	88
La Adjektivo	90
Kvalifikaj adjektivoj	90
Determinaj adjektivoj	94
La Artikolo	95
La Pronom-adjektivoj	100
Posedaj adjektivoj	100
Montraj adjektivoj	100
Rilata adjektivo	101
Demandaj adjektivoj	101
Kolektivaj adjektivoj	102
Kvantaj adjektivoj	103
Nedifinaj kaj neaj adjektivoj	103

La Numeraloj	108
La Adverbo	117
Primitivaj adverboj	117
Tabel-adverboj	117
<i>aŭ</i> -adverboj	121
Nesimetriaj adverboj	123
Neado kaj jesado	126
Derivitaj adverboj	128
La Verbo	130
La Formoj de la verbo	130
La Voĉoj, Tempoj kaj Modoj	134
La Aspektoj	139
Uzado de la tempoj	143
Uzado de la modaloj kaj modoj	157
Uzado de la voĉoj	162
La Prepozicioj	168
La Konjunkcioj	171
La Subjunkcioj	173
La Interjekcioj	174

LA FRAZO

I. VORTSINTAKSO	181
A. Substantiva kerno-vorto	182
I. La epitetoj	182
Adjektiva epiteto	182
Substantiva epiteto	184
Apudmeto (Apozicio)	184
Ekvivalentoj	185
Nominacio	186
Nom-esprimo	186
Citajo	191
Vokativo	191
II. La suplementoj	
de <i>af</i> -substantivo	192
Prepozitiva substantivo	192
Adjektiva suplemento	198
de <i>ad</i> -substantivo	200
Prepozitiva	200
Akuzativa	204
Adjektiva	204
Infinitiva	205
B. Adjektiva kerno-vorto	208
C. Adverba kerno-vorto	211
D. Verba kerno-vorto	212

II. PROPOZICIO-SINTAKSO	213
A. Strukturo de la propozicio	215
La Subjekto	215
La subjekto de la ago	216
Akordo al la subjekto	218
La refleksivo	219
Tipoj kaj ekzemploj	222
Sensubjektaj propozicioj	228
La Predikato	229
A - La ag-propozicio	229
B - La ec-propozicio	231
C - La atribuado	234
La Objekto	239
Substantiva objekto	240
Rekta objekto	242
Nerektaĵaj objektoj	244
Infinitiva objekto	247
La Adjektoj	250
Formo de la adjektoj	250
adverbaj	250
akuzativaj (rektaĵaj)	252
prepozitivaj (nerektaĵaj)	253
infinitivaj	254
nominativaj (absolutaj)	255
Specoj de adjektoj	256
lokaj	256
poziciaj	256
movaj	258
tempaj	264
aktualaj	264
komencaj	266
finaj	267
nombraj	267
stataj	268
situciaj	269
originaj	274
rezultaj	274
modalaj	275
manieraj	275
kaŭzaj	279
celaj	281
koncern-adjektoj	282
traktativaj	282
dativaj	284
ablativaj	285

B. Specoj de la propozicioj	287
I. Specoj laŭ valoro	287
Indika propozicio	287
Dezira propozicio	287
Ordonata propozicio	288
Demanda propozicio	288
II. Specoj laŭ enhavo	289
III. FRAZSINTAKSO	291
1. La kompleksa frazo	293
A - Kunorditaj propozicioj	295
Kopulaj	295
Alternativaj	296
Adversaj	297
Konkludaj	298
Klarigaj	298
Pseŭdo-subpropozicioj	299
Rekta parolo	300
B - Suborditaj propozicioj	302
Kompletivaj	303
subjektaj	309
objektaj	311
nerekta parolo	314
nerekt-objektaj	316
predikativaj	317
Epitetaj	318
rektaj	318
nerekta	322
Adjektaj	323
lokaj	323
tempaj	324
samtempeco	324
antaŭtempeco	325
posttempeco	326
stataj	330
situaciaj	330
societaj kaj separativaj	330
stat-indikaj	332
supozaj	332
koncedaj	336
originaj kaj rezultaj	338
modalaj	338
manieraj	339
manier-indikaj	339
komparaj	339

instrument-indikaj	350
konsekvenc-indikaj	350
kaŭzaj	351
celaj	353
C - Verbotempoj en subpropozicioj	356
2. La vortordo	361

LA VORTFARADO

I. LA VORTKONSISTO DE LA LINGVO	371
La lingvo-elementoj	372
Memstareco kaj solstarivo	373
Vortkategorioj kaj radikkarakteroj	375
Samelementaj kaj malsamelementaj vortoj	376
La propra signifo de la finaĵoj	377
Finaĵa pluformado	378
Historio kaj pravigo de la kategoria divido	382
Neceso kaj sufiĉo	386
La senca elasteco de la finaĵoj	388
II. LA KUNMETADO	391
1. La leĝoj de la kunmetado	393
A - Duelementaj kunmetoj	394
Ĝeneralaj reguloj	394
Reguloj de vortefiko	394
Substantiva ĉefelemento	396
Adjektiva ĉefelemento	399
Verba ĉefelemento	402
Adverba ĉefelemento	408
B - Trielementaj kunmetoj	410
Interelementa grupiĝo	410
Kuntenaj flankelementoj	411
Disfalaj flankelementoj	412
Inversa vortefiko	413
Elementoj latentaj	414
Finaĵoj pseŭdopleonasmaj	415
Klarigo de la inversa vortefiko	417
C - Pli-ol-trielementaj kunmetoj	417
D - Konservo de finaĵoj	418
E - Esceptoj	421
F - Resumo	422
2. Ekzempla demonstrado	423
A - Analizo de vortoj	424
o-finaĵaj vortoj	425
a-finaĵaj vortoj	427
Verbfinalaj vortoj	428

B - Sintezo de vortoj	429
Kuntenaj flankelementoj	429
Disfalaj flankelementoj	431
Streĉado de formoj	432
3. La afiksoidoj	433
A - Sufiksoidoj (difino)	435
(specialaĵoj)	436
Kategoriosufiksoidoj	438
ado	438
participaj finaĵoj	439
aĵo	441
eco	444
ulo	448
Analogeco de la kategorio-sufiksoidoj	449
Substantivaj sufiksoidoj	450
Adjektivaj sufiksoidoj	464
Verbaj sufiksoidoj	467
Kvazaŭsufiksoidoj	475
Pseŭdosufiksoidoj	476
B - Prefiksoidoj	478
Adverbaj prefiksoidoj	479
Radikaj prefiksoidoj	483
Prepoziciaj prefiksoidoj	483
Pseŭdoprefiksoidoj	497
III. LA DERIVADO	498
Veraj sufiksoj	500
Veraj prefiksoj	504
Prefiksiĝo de radikoj	510
Prefiksiĝo de prepozicioj	517
Pseŭdoprefiksoj	518
IV. KRITIKO DE LA ESPERANTA VORTFARADO	519
A. La valoro de la vortsistemo	520
B. La rolo de la Esperanta vortfarado	525

INDEKSOJ KAJ ENHAVTABELO

I. Indekso de la temoj	530
II. Indekso de la referencitaj aŭtornomoj	588
III. Indekso de la mallongigoj	591
IV. Tabelo de enhavo	593

Kompostita de INTELEKSO, Brazilo, enpaĝigita en la Grafika Centro de UEA, Belgio, kaj la Centra Oficejo de UEA, Nederlando, kaj presita de Grafika Entrepreno Tuijtel, Nederlando.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.